



This is a digital copy of a book that was preserved for generations on library shelves before it was carefully scanned by Google as part of a project to make the world's books discoverable online.

It has survived long enough for the copyright to expire and the book to enter the public domain. A public domain book is one that was never subject to copyright or whose legal copyright term has expired. Whether a book is in the public domain may vary country to country. Public domain books are our gateways to the past, representing a wealth of history, culture and knowledge that's often difficult to discover.

Marks, notations and other marginalia present in the original volume will appear in this file - a reminder of this book's long journey from the publisher to a library and finally to you.

### **Usage guidelines**


Google is proud to partner with libraries to digitize public domain materials and make them widely accessible. Public domain books belong to the public and we are merely their custodians. Nevertheless, this work is expensive, so in order to keep providing this resource, we have taken steps to prevent abuse by commercial parties, including placing technical restrictions on automated querying.

We also ask that you:

- + *Make non-commercial use of the files* We designed Google Book Search for use by individuals, and we request that you use these files for personal, non-commercial purposes.
- + *Refrain from automated querying* Do not send automated queries of any sort to Google's system: If you are conducting research on machine translation, optical character recognition or other areas where access to a large amount of text is helpful, please contact us. We encourage the use of public domain materials for these purposes and may be able to help.
- + *Maintain attribution* The Google "watermark" you see on each file is essential for informing people about this project and helping them find additional materials through Google Book Search. Please do not remove it.
- + *Keep it legal* Whatever your use, remember that you are responsible for ensuring that what you are doing is legal. Do not assume that just because we believe a book is in the public domain for users in the United States, that the work is also in the public domain for users in other countries. Whether a book is still in copyright varies from country to country, and we can't offer guidance on whether any specific use of any specific book is allowed. Please do not assume that a book's appearance in Google Book Search means it can be used in any manner anywhere in the world. Copyright infringement liability can be quite severe.


### **About Google Book Search**

Google's mission is to organize the world's information and to make it universally accessible and useful. Google Book Search helps readers discover the world's books while helping authors and publishers reach new audiences. You can search through the full text of this book on the web at <http://books.google.com/>

















EUROPO



AFRIKO



AZIO

FUNDAMENTO · KOMPREN  
ANTE UNU · LA ALIAN ·  
LINGVA

POPOLJ FAROS  
EN  
KONSENTO UNU · GRANDAM  
RONDON

# THE ESPERANTIST.



NEUTRALA  
RUS

AMERIKO



FAMILIAN · · ·




OCEANTIO

VOL. I.

Nov., 1903-Dec., 1904.

Wholesale Agent:  
14, NORFOLK ST., STRAND,  
LONDON.



# ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the spreading  
of the International Language.

Edited by H. BULLINGBROKE MUIR.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- 14 francs; 1½ roubles; 75 centes.

Printed by THE ESPERANTO CLUB, 21, OUSE TOWER, LONDON, W.C.

## CONTENTS.

|  | Page  |
|--|-------|
| ESPERANTO (W. T. Stoll) ..                 | 1-2   |
| LETTER'S PAGE ..                           | 3     |
| LETTER FROM (C. Bekwith) ..                | 4     |
| THE "TRAVEL" (translated by A. Murray) ..  | 5     |
| ESPERANTO IN DAILY LIFE (J. Ellis) ..      | 6     |
| ESPERANTO IN SHORTLAND (G. Lodge) ..       | 7     |
| A WALKER'S LIFE (Don Elton) ..             | 8     |
| YOUR FUTURE HORIZON ..                     | 9     |
| REMARKS ON THE TELEGRAPH (C. F. Harris) .. | 10    |
| DEVELOPMENT OF PEACE ..                    | 11    |
| FRANCE HELD IN EXTREME ..                  | 12    |
| OUR NEW FRIEND (D. A. Lockwood) ..         | 13    |
| LETTERS BY GIBSON ..                       | 14-15 |
| AN ANSWER: MRS. G. A. MUIR ..              | 16    |

## The HON. SECRETARIES of ESPERANTO SOCIETIES are

|  |
|--|
| BOURNEMOUTH, J. F. H. Woodard, Esq.,<br>Woodard & Co. Stationers' Hall |
| DUBLIN, C. Bourne, Esq.,<br>21, Abchurch Lane, City, London            |
| EDINBURGH, Miss Twiss, B.A.,<br>A. & C. Co. Stationers' Hall           |
| GLASGOW, J. Hunter, Esq.,<br>10, Glasgow Street, Parkside              |
| HUDDERSFIELD, G. H. Taylor, Esq.,<br>10, Great Hall Street             |
| KIDDERLEY, J. Ellis, Esq.,<br>Carpenter, Stationers' Hall Street       |
| LONDON, H. Bullingbroke Muir,<br>21, Ouse Tower, W.C.                  |
| MANCHESTER, Dr. A. von Marenz,<br>Grafton Hall                         |
| NEWCASTLE, H. W. Vaughan, Esq.,<br>2, Colwell Terrace, Gosforth        |
| PLYMOUTH, J. A. Hill, Esq.,<br>5, Barton Terrace, Brixham              |
| PORTSMOUTH, Dr. Greenwood,<br>20, St. George's Street                  |
| SIRMITON, P. Howell, Esq.,<br>The Dispensing Chemist, Brixham          |

A. B.—The only person who can give you the full details of the Esperanto Club and its work is the Hon. Secy, BournemOUTH, who will do all in his power to assist you in all matters.

# The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

*Unbound by ties of nationality:  
The common bond of union of all civilised peoples.*

The Remington can be supplied fitted for Esperanto.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

# La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMAŜINO.

*Pripensu je tio!*

LA INTERNACIA MAŜINO.

*Tute liberigita de naciaj ligiloj:  
La Komuna unuigilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.*

La Remington estas liverita kun Esperantaj presiliteroj.

LA REMINGTON TYPEWRITER KOMPANIO,  
100, Gracechurch St., Londono, E.C.

## IN OUR NEXT ISSUE

will appear a list of Esperantists who desire to correspond in Esperanto about specified subjects.

This is an excellent means of testing the value of Esperanto, and it is to be hoped that many will send in their names. The cost of insertion is 6d.

## We beg to remind our Readers

not to omit to translate the letters enclosed in the Text Book, and to send the translations to us with four penny stamps. THE ADRESARO—a list of Esperantists—will then be sent, by means of which one can correspond all over the world in Esperanto.

## ESPERANTISTS can save 10-25%.

Off the usual prices of  
OFFICE STATIONERY.

Printing, Litho, Relief Stamping, Engraving, Brass Name Plates, Rubber Stamps, &c., &c.

Also COPYING APPARATUS (and Materials) for manifold Writing, Sketches, Music, Typewriting, &c., from 2/8, carriage paid.

LETTER FILES: Best and cheapest system for filing Letter Invoices, &c., in book form, 1/4, carriage paid.

COPYING BOOK AND PRESS combined, for home use or travelling, 4/., carriage paid.

### Novelty Department.

If you have an idea which you think a good account, I shall be pleased to receive particulars with a view to perfecting and patenting it for you or running it out.

If you require any Machine or Goods, I shall be pleased to furnish estimates. I divide the usual trade profits with my customers.

to good working it will furnish

F. W. ZIMER, 2, Pancras Lane, E.C. St..



This is a reduced facsimile of the design for an illustrated Postcard.

It is obtainable in two patterns, Inland and Foreign. All the finest quality ivory cards. Price for propaganda purposes, 1/1 for 50.

State whether Inland or Foreign are required.

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

No. 1.

NOVEMBRO, 1903.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d.]

## ESPERANTO.

Unua vorto en unua artikolo de la unua ekzemplero de tiu ĉi Gazeto estas signifa. "Esperanto!" Espero estas la ŝlosilo de la tuta movado. Ni do esperas ke ni movadas. Ĉar ni esperas, ni eldonas tiun ĉi Gazeton, ni fondas Esperantistajn grupojn kaj ni faradas ĉion, kion ni povas, por disvastigi Esperanton en la mondo.

Esperantistoj ne utiligas maloptimistojn. Al "Giganto Malespero" Esperanto estas sigelata libro. Kaj Espero, kiel sia fratinvirto Fido, antaŭvidas je la estonteco, ridas je nepoveblecoj kaj diras "Ĝi devas fari."

Kvankam Esperanto estas enradikata en kristanaj virtoj kaj lia idealo estas atingebla nur en malproksima estonteco, ĝi tamen estas unu el la plej simplaj kaj klare necesaj aferoj en la mondo. Ĝi estas tiel simpla kaj necesa ke ni miregas ke homaro nur nun elpensis ĝin. Nun estas neeble prokrastadi ĝian enkondukon, kiel necesega ilo por internaciaj interrilatoj.

La deknata centjaro, pli faciliginte vojaĝojn, necesigis elpenson de internacia lingvo. La dudeka centjaro devas universaligi ĝian alprenon. Ĝis tiam kiam *lingua franca* aŭ universale akceptita helpanto lingvo estas alprenata de ĉiuj nacioj, la pliigo de internaciaj rilatoj estas ankaŭ pliiga laboro, ekkoleremeco kaj malkomprenecoj.

Diversaj provoĵoj estas jam faritaj por doni similan ilon. Unu post la alia, ili malgrandigadis ĝis la nuna tempo, kiam Esperanto venkis. Estas kredeble ke, je kuro de aĝoj, homara saĝeco povus elpensi lingvon pli idealan ol Esperanto, sed ni ne povas atendi. Ni bezonas helpantan lingvon, kaj ni tuj bezonas ĝin. Kaj, ĉar per unanima konsento de ĉiuj el la plej kompetentaj aŭtoritatuloj, Esperanto estas la plej bona ŝlosilingvo ĝis nun elpensita; ĉar oni ne povas dubi ke ĝi estas multe la plej disvastigata kaj komprenata; ni invitas ĉiujn Geanglojn ellerni Esperanton.

Speciale ni skribis "ŝlosilingvon" ĉar estas necese je la komenco akcentegi la fakton ke nenia Esperantisto esperas aŭ deziras anstataŭi alian lingvon per la enkonduko de Esperanto. Neniu songas devigi ĉiujn mondloĝantojn forlasi uzadon

## ESPERANTO.

The first word in the first article of the first number of this Periodical is suggestive. Esperanto! Hope is the Keynote of the whole movement. We hope, therefore we are moving. It is because we hope we publish this paper, we form Esperantist circles and we do all that we can to push a knowledge of Esperanto throughout the world.

Esperantists have no use for 'pessimists. To Giant Despair Esperanto is a sealed book. And Hope, like its sister grace Faith, looks to the future, laughs at impossibilities and says "It shall be done."

Yet, although Esperanto has its roots in the Christian Graces and its ideal can only be attained in the far future, it is one of the simplest and most obviously necessary things in the world. So simple is it and so necessary that we marvel that mankind should have but now discovered it. It is however impossible any longer to delay its introduction as an indispensable instrument of human intercourse.

The nineteenth century, by facilitating travel, made the invention of a key language a necessity. The twentieth century must make its adoption Universal.

Until a *lingua franca* or universally accepted key language has been adopted by all nations, the increase of international intercourse is an increase of trouble, of irritation and misunderstanding.

Various attempts have been made to supply such a medium. One by one they have dwindled away until now Esperanto holds the field!

It is conceivable that, in the course of the ages, the wisdom of mankind might invent some language more ideally perfect than Esperanto, but we cannot afford to wait. We want a key language and we want it now. And as by general agreement of all the most competent authorities, Esperanto is the best key language yet invented, as there is no question that it is by far the most widely spread and generally understood, we invite all English-speaking men and women to master Esperanto.

We say "Key language" purposely, because it is necessary at the outset to emphasize the fact that no Esperantist hopes or desires to supersede any other language by the introduction of Esperanto. No one dreams of inducing all peoples that

de siaj propraj lingvoj, kiam ili interparolas kun gesamlandanoj en limoj de siaj naciaj kaj domaj rilatoj. Oni nur antaŭmetas Esperanton kiel dua lingvo, kiu, se universale uzita, ebligus ĉiulandanojn facile interkomunikadi kun ia fremdulo, kia ajn estu lia patruja lingvo.

Tio kion ni esperas estas fari homaron dulingva.

En tiu ĉi Gazeto, fondita je Espero kaj Konfido ke la estonteco pravigos nian kredon, ni kuraĝigas antaŭmeti koregan peton ke nia legantaro etendos al ni la Bonfaradon kiun ni bezonas por senkulpigi la neeviteblajn erarojn de novicoj. La kredo je redaktora ĉioscio estas ĝenerale absurda, kaj estus tro memfida kaj ridinda en simila eldono je tiu ĉi, kie Redaktoro kaj Kunlaborantoj estas ĉiuj eklernantoj.

Ĉiuj proponoj kaj kritikoj estos plezure kaj per dankesprimoj ricevataj.

“Neniu el ni estas senerara, eĉ la plej juna” estas saĝa proverbo, precipe inda je akcepto de tiuj en entrepreno simila je tiu ĉi, kie ni ĉiuj estas pli aŭ malpli novicoj, uzante lingvon kiu ankoraŭ estas en sia infaneco.

Jen estas resumo de la kaŭzoj kiuj fondigis tiun ĉi organon de la Esperanta movado en Britujo.

Ni estas Esperantistoj ĉar ni havas esperon kaj konfidon je la progreso de homaro.

Ni estas Esperantistoj ĉar ni kredas ke, pro la senĉese kreskantaj facilecoj por internacia komunikado, la alpreno de helpanta lingvo estas neevitebla kaj absolute necesa.

Ni estas Esperantistoj ĉar la alpreno de Esperanto ebligos al ĉiajnaciaj homoj partopreni la plej bonajn aldonojn kiujn ĉiu povis aldoni al la pensoj kaj sciigoj de la mondo.

Ni estas Esperantistoj ĉar jen estas bonaj komercaj profitoj per la alpreno de simila ilo per kiu komercistoj povos priskribi, anonci kaj vendi siajn produktojn en ĉia lando sen la deviga helpo de tradukistoj; kaj fine—

Ni estas Esperantistoj ĉar, sen simila ŝlosilingvo, ni neniam povos praktike efektiviĝi la altegan veron pri la universala frateco de ĉiuj nacioj.

Tial ni eldonas tiun ĉi malgrandan organon kaj korege invitas ĉiujn, kiuj partoprenas tiujn ĉi fidojn kaj idealojn, informiĝi pri tiu ĉi Esperantista movado kaj vidi por si ĉu ne estus bone ke ankaŭ ili aliĝus al Esperantistaro.

*Larvorte tradukita de la R. DALFORE.*

on earth do dwell to abandon the use of their own languages, in their intercourse with men of the same tongue within the limits of their national and domestic relations. Esperanto is only put forward as a second language which if universally adopted would enable the natives of every land to communicate easily with any foreigner, no matter what might be his mother tongue.

What we hope is to make the human race bi-lingual.

In this journal, founded as it is in Hope and in good confidence that the Future will justify our faith, we venture to put forward an earnest plea that our readers will extend to us the Charity which will be sorely needed to excuse the inevitable blunders of beginners.

The assumption of Editorial omniscience is usually absurd, but it would be both preposterous and ridiculous in such a periodical as this, in which Editor and staff alike are but beginners.

All suggestions and criticisms will be gladly received and cordially acknowledged.

“We are none of us infallible, not even the youngest,” is a wise saying, especially worthy of acceptance by those on a venture like this, where all are more or less novices, using a language that is still in its infancy.

Here is a recapitulation of the reasons which have led to the founding of this organ of the Esperantist movement in Britain.

We are Esperantists because we have hope and good confidence in the progress of the human race.

We are Esperantists because we believe that, in the constantly increasing facility of international communication, the adoption of a key language is inevitable and absolutely necessary.

We are Esperantists because the adoption of Esperanto will enable men and women of every nation to share with all others the best contributions which each has been able to make to the thoughts and knowledge of the world.

We are Esperantists because there are solid business advantages in the adoption of a medium which will enable business men to describe, to push, and to sell their goods in every land, without having to rely upon the services of translators; and finally—

We are Esperantists because without some such key language we never can give practical expression, or attain to a full realization of the sublime truth of the Universal brotherhood of all the nations that dwell upon the earth.

Therefore we publish this little organ, and cordially invite all those who share these faiths and these ideals to inquire into this Esperantist movement and see for themselves whether it would not be well for them also to join the army of Esperantists.

W. T. STEAD.

## REDAKTORA PAĜO.

Eldonante novan organon estas kutime ke la Redaktoro skribu malmultajn vortojn pri ĝia celo. Sed, ĉar Sinjoro Stead tiel kapable faris tiunĉi en la unua artikolo, mi nur deziras rediri ke—

- (1). *Nia celo estas disvastigi Esperanton kaj unuigi Anglajn Geesperantistojn.*
- (2). *Tiu ĉi Gazeto neniel estas politika organo.*

Ni korege fidas ke nia legantaro trafigos nin.

Jen estas tri gravaj metodoj por varbi novajn rekrutojn.

- (1). *Paroladi kiel eble plej ofte pri Esperanto.*
- (2). *Disdoni librojn kaj broŝurojn.*
- (3). *Skribi leterojn kaj artikolojn pri Esperanto al ĵurnaloj, ĉiam enhavante adreson de iu, kiu respondos al demandoj pri la lingvo.*

Ĉiuj povas utiligi la unuan el tiuj ĉi propagandiloj.

La libroj-disdono estas por riĉuloj, kaj ni esperas ke ili disdonos niajn unufoleojn kiuj estas aĉeteblaj je la stacidomaj librejoj de Sroj. W. H. Smith & Sons. La verketo No. 52 ankaŭ estas taŭga lernlibreto por eklernantoj.

Multaj amikoj jam skribis utilegajn artikolojn pri, per, pro, por Esperanto, kaj tial varbis multajn aligantojn. Korege ni deziras danki ilin, kaj ni esperegas ke ili uzados tiun ĉi bonegan metodon por disvastigi Esperanton. Ni ĉiam provos daŭrigi la korespondadon kaj per dankesprimado akceptos prestranĉaĵojn, kiam ajn oni sendos ilin al ni.

Skeptikuloj ofte diras “Ĉu mi gajnos se mi eklernus Esperanton?” La vera respondo certe estas “Jes”; sed ni devas aldoni ke oni povos *perdi* monon per Esperanto. Ni ĵus ricevis Esperante-presitan sciigon pri fremda loterio. La papero estas tre bona ekzerco por lernanto; sed ni ne fidus je loterioj, kaj ni esperas ke nia legantaro atendos ĝis kiam oni sendos ĉi tie anoncojn pri pli bonaj komercaj aferoj ol loterioj antaŭ komencante rilatojn kun fremduloj. Kiam tiu ĉi tempo venis, eĉ skeptikuloj silentiĝos.

Por fini, mi deziras aldoni koregan dankesprimon al ĉiuj Gesinjoroj kiuj helpis min en mia malfacila verko, kaj kiuj, mi korfidas, daŭrigos siajn helpojn en la estonteco.

LA REDAKTORO.

## EDITOR'S PAGE.

In issuing a new organ it is customary for the Editor to write a few words concerning its purpose. But as Mr. Stead has so ably done this in the first article, I merely wish to repeat that—

- (1). *Our purpose is to spread Esperanto and to unite English Esperantists.*
- (2). *This Gazette is in no manner a political organ.*

We most heartily trust that our readers will enable us to succeed in this purpose.

There are three important means of enlisting new recruits.

- (1). *To talk as often as possible about Esperanto.*
- (2). *To distribute books and pamphlets.*
- (3). *To write letters and articles about Esperanto to the papers, always containing the address of someone who will answer questions in the language.*

All can make use of the first of these means of propaganda.

The giving away of books is for the well-to-do. We hope that they will distribute our Broadsheets, which are obtainable at the station book-stalls of Messrs. W. H. Smith & Sons. The little work No. 52 is also a suitable text-booklet for beginners.

Many friends have already written most useful articles about, in, in favour of, for, Esperanto, and have thus gained many adherents. Most heartily do we desire to thank them, and we hope that they will continue to make use of this excellent means of spreading Esperanto. We shall always try to prolong the correspondence and will thankfully accept press-cuttings whenever they are sent to us.

Sceptics often say “Shall I gain if I begin to learn Esperanto?” The true answer certainly is “Yes”; but we must add that one can also *lose* money through Esperanto. We have just received a notice—printed in Esperanto—of a foreign lottery. The paper is an excellent exercise for a pupil; but we do not trust in lotteries, and hope that our readers will wait till people send notices here of better commercial undertakings than lotteries, before entering into relations with foreigners. When this time has come, even sceptics will become silent.

In conclusion, I desire to add a most hearty expression of thanks to all those who have aided me in my difficult work, and who, I heartily trust, will continue their assistance in the future.

*Literally Translated by THE EDITOR.*

## ITALA SOMERO.

Malmulte da fremduloj konas la Liguran marbordon<sup>1</sup> dum la somera sezono, inter la komenco de Junio kaj la finiĝo de Septembro. Ili alvenas tien ĉi nur por eviti la malvarman nordan vintron, kaj, post Pasko, ekforiradas. Ili nature volas reiri siajn hejmojn kaj proprajojn sed plimultaj, precipe personoj sen devoj kaj sen ia okupado, veraj mondvagantoj, sekvis ilin, ĉar "La sezono estas finiĝita"! Tiuj ĉi sopiras je aliaj lokoj, kie ili povos rekomenci senfinajn vizitojn kaj ricevi ĉiutagajn invitojn al kunvenoj aŭ aliaj amuzoj. Ankaŭ multaj erare kredas ke la somera varmo estas netolerebla. Sed iuj ne havante alian hejmon, aŭ aferistoj, restas, tre kontentaj pro la trankvileco. Ili pace laboras aŭ verkas, kaj ĝojas la sensanĝeman belan veteron de la suda somero, ne timante iom pli malbona ol tertrema skueto<sup>2</sup>. El ĉiuj monatoj, Junio estas la plej bela; la ĝardenoj kaj la kamparoj estas florplenaj; la olivujoj, ordinare tiel grizkoloraj, estas preskaŭ verdaj: la rozoj kaj la kariofiloj<sup>3</sup>, sufiĉe multekostaj dum la vintro, ne havas plu valoron; oni povas havi plenbrakon de ili per danko. Julio estas ankaŭ belega. La urbanoj komencas marbanojn, ĉar antaŭ la festo de Johano Baptisto, la maro ne estas tre saniga\* Ĉiutage oni vidas laŭlonge la marbordo junularon brunigitan de la suno, kaj kuŝitan sur la ŝtonoj kvazaŭ krokodiloj. Antaŭ la sunkuŝiĝo familioj malsupreniras al la maro, levas diverskolorajn tendetojn<sup>4</sup> en kiuj ili sin senvestigis, kaj, post la bano, kunvespermanĝas. Kelkafoje sed malofte, ŝarko proksimigas al la tero, sed kvankvam tiuj ĉi malagrablaj vizitantoj plioftiĝas, ĝis nun oni povas bani sendanĝere. Oni diras ke la fiŝoj elvenis el la Ruĝa Maro tra la Suezaj Kanalo. Antaŭ ne longe unu el miaj Italaj amikoj estis fiŝkaptanta vespere kaj malsupre, knabo naĝis. Subite la knabo ekkriis "Ho, kia bela hundego." Mia amiko regardis kaj ekvidis proksime grandan fokon, ĉirkaŭ tri jardoj da longeco kiu lin regardis per siaj brilantaj kaj inteligentaj okuloj. La besto diris "Papa" kaj "Mama" kaj tuj malaperis. Estis unu el la du specoj de fokoj kiuj loĝas en la varmaj maroj. La Angla nomo estas Monaha Foko (Monk Seal) oni edukas ilin sen malfacileco, kaj kelkafoje oni vidas ilin en Eŭropaj urboj je la nomo "La Parolanta Fiŝo." La fiŝistoj tie ĉi certigas min ke tiuj ĉi fokoj alvenos teren, surrampos sur la sablon ĝis la proksimaj vinberejoj kaj ekmanĝos la vinberojn. Mi mem dubas pri la vereco de la rakonto, sed eble iu el miaj legantoj diros ĉu la fokoj estas iam herbmangantoj. Nun, kiam ajn mi renkontas mian amikon, mi diras al li ke mi ĵus vidis fokon sur la pinto de olivujo, serĉantan oleon por sia salato. Li mokas kaj diras ke almenaŭ preter la vinberoj, la fokoj manĝas figojn!

La monato Aŭgusto estas iom tro varma, ĉar la suno brulegas la tutan tagon; la noktoj estas mallongaj kaj venas preskaŭ neniam eĉ pluvero. Do kiu povas, forflugas al la najbaraj maralpoj. Sed je la komenco de Septembro la vetero estas de nove tre agraba. La sufiĉegaj fruktoj, persikoj, figoj kaj akvomelonoj anstataŭis la florojn; kaj oni forgesas la sekiĝitajn ĝardenojn kaj la profundan pulvon sur la stratoj.

Tiam, tro tro frue, Septembro finiĝas. La pluvoj aŭtunaj komencas: la fremduloj ekrevenas, kaj la dolĉa paco kaj kvieteco de la someraj monatoj estas foriritaj, kiel,

## LA LASTA ROZO DE SOMERO.—(MOORE).

Nun floras de l'somero  
La sola lasta rozo.  
La kunvivantoj ĝiaj  
Velkis en mortripozono:  
Ne estas flor'parenca,  
Aŭ rozburgono ia,  
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn  
Redoni al alia.

Mi ne vin lasos sole,  
Sur la tronket' plendeti  
Ĉar la beluloj dormas,  
Vi devas kundormeti.  
En morto, sen parfumo,  
L'amikoj jam dormetas:  
Do floron vian teren  
Ĝentile mi disĵetas.

Mi tiel volus sekvi  
Se l'amikec' finiĝus  
Aŭ la juveloj brilaĵ  
De l'amular' foriĝus:  
Ĉar se la koroj veraĵ  
Kaj dolĉaj ne plu estus,  
En la dezerta mondo  
Volonte kiu restus?

CLARENCE BICKNELL.

\* A popular tradition.

<sup>1</sup> Sea-shore.

<sup>2</sup> A slight earthquake.

<sup>3</sup> Cloves.

<sup>4</sup> Tents.



[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO.

Dramo de SHAKESPEARE: tradukis A. MOTTEAU.

*La plej malnova presita ekzemplero de "la Ventego" troviĝas en la foliega volumo, kiun la aktoroj Heminge kaj Condell—ambaŭ kolegoj de Shakespeare—preparis en la jaro 1623a, kaj ĝia unua prezentiĝo okazis la 1-an de Novembro 1611a, laŭ samtempaj raportoj.*

*Tiuj faktoj klarigas la maturan belecon, la riĉege imagitan fantazion de tiu nobla dramo, videble verkita dum la maturaĝo de ĝia kreinto—unu el liaj lastaj ĉefverkoj—eble la lasta.*

AL LA MAJSTRO,  
LA EIPENSINTO DE ESPERANTO!

Ĉu *La Ventegon* esperantigante  
Mi troatencas? Diru al mi, majstro.  
Ho! ŝajnas mia Shakespeare tia fonto  
Ke ĉiutage ĉerpas mi belaĵojn  
En liaj helaj paĝoj! Do rigardu  
Ne tro severe tiun ĉi libreton  
Malindan eĥon je l'Avona Cigno.

A.M.

## PERSONOJ.

ALONZO, reĝo de Neapolo.  
SEBASTIANO, frato de Alonzo.  
PROSPERO, rajta duko de Milano.  
ANTONIO, frato de Prospero, duka uzurpulo de Milano.  
FERDINANDO, reĝido de Neapolo, filo de Alonzo.  
GONZALO, honesta maljuna konsilano.  
ADRIANO } kortegaj sinjoroj.  
FRANCISKO }  
KALIBANO, sovaĝa kaj malbela sklavo.  
TRINKULO, kortega amuzulo.  
STEFANO, drinkeina kelisto.  
ŜIPESTRO, SUBESTRO, MARISTOJ.  
MIRANDO, filino de Prospero.  
ARIELO, aera spirito.  
IRISO, CERESO, JUNO, } spiritoj.  
NIMFOJ, RIKOLTISTOJ, }  
ALIAJ SPIRITAJ SERVISTOJ de Prospero.

\* \* \* La Agado havas lokon unue en ŝipo apud la landbordo, poste sur insulo.

## AKTO I.

SCENO 1.—*En ŝipo—Ventega fulmotondra bruego aŭdata.*

(*Venas ŜIPESTRO kaj SUBESTRO.*)

ŜIPESTRO.—Subestro!

SUBESTRO.—Tie ĉi, mastro; kion vi ordonas?

ŜIPESTRO.—Bone; admonu la maristojn, vigligu ilin, aŭ la ŝipo disrompiĝos sur la ŝtonegoj. Vigle, vigle!

(*Venas MARISTOJ.*)

SUBESTRO.—He! kamaradoj, kurage! kurage! Bravuloj vigle! vigle! Mallevu la velojn; atentu la fajflon de l'mastro! . . . Nun, blovu, ventoj, ĝis vi krevos, se estas sufiĉa spaco!

(*Venas ALONZO, SEBASTIANO, ANTONIO, FERDINANDO, GONZALO kaj ALIAJ.*)

ALONZO.—Bona subestro, atentu! kie estas la ŝipestro? Brave agu, ŝipanoj!

SUBESTRO.—Mi petas ke vi restu malsupre.

ANTONIO.—Kie estas la ŝipestro, subestro?

SUBESTRO.—Ĉu vi ne aŭdas lin? Vi malhelpas nian laboron. Restu en viaj ĉambretoj. Vi nur helpas la ventegon tie ĉi.

GONZALO.—Neniel; estu pacienca!

SUBESTRO.—Jes, tuj kiam la maro estos. Iru for de tie ĉi! Ĉu tiaj blekigantoj timas reĝan nomon? Ne! Iru en la ĉambbron. Silentu! Ne malhelpu nin.

GONZALO.—Prave; memoru, tamen, tiujn kiujn la ŝipo portas.

SUBESTRO.—Neniun kiun mi pli amas ol min mem. Nu! vi estas konsilano; se vi povas ordoni ke tiuj ĉi elementoj silentu, kaj tiamaniere trankviligu la nunan veteron, bone; ni ne tuŝos plu ian ŝnuregon; uzu vian povon! sed, se vi tion ne povas, estu danka ke vi jam tiel longe vivadis, kaj en via ĉambreto pretiĝu por ia ebla estonta malfeliĉo, se ĝi okazos. (*Al la MARISTOJ*) Vigle, kamaradoj! (*Al la ALIAJ*) For de tie ĉi, mi petas! (*Foriras*).

GONZALO.—Mi ja ĝojas pri tiu ĉi malgentilulo; ŝajnas al mi ke sur li ne estas signo de drononto; li perfekte prezentas pendigoton! Ho, sorto! zorgu pri lia pendigo; ke lia sorta ŝnuro nun fariĝu nia sava ŝnurego, ĉar, alie, ni ne povos esperi ian bonaĵon: se li ne naskiĝis pendonta, vere, mizera estas nia stato! (*Ĉiuj foriras*).

(*Dadrigota*).

## ESPERANTO POR ĈIUTAGA VIVADO.

## ESPERANTO IN DAILY LIFE.

Ne malmultaj homoj jam pruvis per la reala sperto ke Esperanto ja posedas ĉiujn ecojn, kiujn praktika parolata lingvo bezonas, sed la loĝado de la Prezidanto de la Societo "Esperanto" en Havro (Francujo), kiu loĝado okazis antaŭ ne longe, donis pluan pruvon. Kun li ĉeestis sia edzino, kiu estis tre kontenta babilante kun la Havraj Esperantistinoj, la Sekretario de la sama societo, kaj amiko, al kiu Esperanto estis nova lingvo.

Post kelkaj tagoj, la Sekretario de la Esperanto Klubo ankaŭ alvenis kaj Fraŭlino Lawrence, la eks-sekretariino.

La kvar Kihlianoj pasigis dek-unu tagojn en unu loko, loĝante en hotelo kie kvar profesoroj ĉe la Havra Liceo ĉiutage mangadis, kaj dum almenaŭ du kaj duono horoj ĉiutage la samaj personoj interparoladis Esperante. Necese, tre granda nombro da diversaj objektoj estis preparolata. Ne estis mallonga viziteto, ne estis kelkaj frazoj pri la vetero aŭ la sano, aŭ kelkaj demandoj pri pakajoj kaj biletoj, kaj la plej bona vojo al Ĉitie-aŭ-tie, sed vera interŝanĝo de opinioj pri ĉiaspecaj aferoj, pasanta inter personoj ĝis tiam apartigitaj de la manko de komuna ilo de parolado.

Plue, la loĝado prezentis okazojn por fari paroladojn, preparitajn kaj senpreparajn, Esperante, kaj la kara lingvo pasis tra la provo venkante. Nun Angloj havas Anglan ateston, ke Esperanto ne estas nur interesa ludilo por pasigi senokupajn horojn, sed sana, fortika lingvo, taŭga por ĉiuj praktikaj utilaĵoj, kaj ankoraŭ lernebla sen multa penado.

Samtempe, alia argumento, kiu tiuj, kiuj estas blindigitaj de la antaŭjuĝado, ofte uzas kontraŭ Esperanto, nome, ke pro la diferencoj de la elparolado kaj de la nacia idiomo, diverslandaj Esperantistoj ne povus kompreni Esperanton parolatan de alilandulo, estis efektive silentigita. De la unua momento, kiam la Angloj marŝis sur la Francan teron ĝis la finaj adiaĵoj, oni trovis nenion malfacilecon, nek parolante nek komprenante.

Tio estis pli rimarkinda, ĉar la vizitantoj havis tre malofte okazojn por interparoladi Esperante. Ili estis similaj al knaboj ĵetitaj en akvon, kiuj devigas aŭ naĝi aŭ droni. Certege ili ne dronis; kontraŭe per Esperanto, kaj per Esperanto sole, ili pasigis plejplaĉantan libertempeton, kiun ili kore deziras ripeti la proksiman jaron, ĉu en Havro, ĉu aliloke.

Not a few people have already proved by actual experience that Esperanto possesses all the qualifications requisite for a practical spoken language, but the visit of the President of the "Esperanto" Society to Havre (France), which took place a little while ago, has afforded another proof. His wife, who was very happy chatting with the Havre lady-Esperantists, the Secretary of the same Society, and a friend, to whom Esperanto was a new language, accompanied him.

After a few days the Secretary of the Esperanto Club and Miss Lawrence, the ex-Secretary, also arrived.

The four Keighleyites spent eleven days in one spot, living at an hotel where four Professors of the Havre Lycée daily took their meals, and for at least 2½ hours each day the same persons conversed in Esperanto with each other. Necessarily the number of topics covered was very large and the subjects of conversation most various. It was not a case of a short call, some remarks on the weather and health, or a few questions as to luggage and tickets and the best way to So-and-so, but a genuine interchange of opinions on all manner of subjects, passing between persons previously separated from each other for lack of a common medium of speech.

Not only that, but the visit gave opportunity for making speeches, both set and extempore, in Esperanto, and the prized language came through the ordeal with flying colours. Englishmen have now English testimony that Esperanto is not merely an interesting toy to while away the leisure hours, but a sound, solid language, available for all practical purposes, but yet to be acquired without serious effort.

At the same time another argument, which those who are blinded by prejudice frequently employ against Esperanto, that is to say, that on account of the differences in pronunciation and national idiom, Esperantists of various countries would not be able to understand the Esperanto of a foreigner, was effectually silenced. From the first moment that the English set foot on French soil to the final adieux, no difficulty was experienced, either in speaking or in understanding.

This was all the more remarkable because the visitors had previously had very few opportunities of conversation in Esperanto. They were like boys thrown into the water, they had either to swim or drown. Most assuredly they did not drown; on the other hand, by means of Esperanto, and by nothing else, they spent a most pleasant little holiday, which they long to repeat next year, either at Havre or elsewhere.

ESPERANTO IN SHORTHAND.

Through the courtesy of Sir Isaac Pitman & Sons, Ltd., who have provided us with this plate, we are enabled to show our readers the first example of Esperanto printed in the Pitman system. It must be borne in mind that all the vowels are long in Esperanto. We hope that this anecdote will serve many of our readers as a reading exercise.

G. Ledger.

N.B.—In line 14 "sherto" should read "sherto."  
 15 "sherkulo" " " "sherkulo."  
 16 "elversis" " " "elvershis."

Oni diras ke, marvojaĝante, ventroparolisto amikiĝis kun la fajristo de la ŝipo, kaj ĉiutage eniris en la verkĉambbron. Unu tago la vojaĝanto sidigis apud la fajrejo, kaj ŝajnis fumadi sonĝe kaj kviete. Baldaŭ turnilo ekbruegigis kaj la fajristo venis kaj oleis ĝin. Tiam li rekomencis sian

laboron. Iom poste, li reaŭdis la saman bruon kaj rekuris, oleujo en mano, por kvietigi ĝin. Tion farinte, li laboradis; sed preskaŭ tuj rekomencis de nove la bruon. Tiam la fajristo eksuspektis la kaŭzon. Kviete marŝante malantaŭ la ventroparolisto, li elverŝis multe da oleo sur la ŝerculon. "Nun," li diris, "mi divenas ke la turnilo ne bruadigos." La ŝerco, oni diras, estis tiel bona ke la ventroparolisto ne deziris refari ĝin!

Tradukis G. LEDGER.

Kiel senkrurulo povos fariĝi kuristo?  
 Nur kutimante paroli pie, li tiel fariĝos  
*pediranto.*

E.L.

Sinjorino B. atendis viziton de la Episkopo, kaj ŝi instruis la knabserviston kion li devas fari. "Kiam vi alportos al lia moŝto varman akvon, vi frapos je la pordo. Sendubela Episkopo demandos "Kiu frapas?" Tiam vi devas respondi "La Knabo, mia Sinjoro."

La Episkopo venis kaj poste supreniris en sian ĉambbron. La knabo frapis kaj li demandis "Kiu estas tie?" La timema knabo respondis "La Sinjoro, mia knabo."

Jen kio okazis al Angllando, laŭ la gajhumora franca verkisto Alphonse Allais. "Ĉar de longege oni elfosis Anglondon por eltiri karbon kaj feron, la granda insulo fariĝis tute kava, kaj sekve pli malpesa ol la akvo kiu ĝin ĉirkaŭas. Ĝi do naĝis. Sed la Angloj kiuj timis ke ilia patrujo povus fornaĝi al la Kontinento elpensis kaj almetis la fadenegojn telegrafajn kiuj ludas la rolon de ŝnuroj alligantaj la insulon al la firmaĵo. Sekve Anglujo estas firme fiksita kaj ne povos perdiĝi en oceano."

Tradukis E. LEGOFFRE.

Maristeto demandis ŝipestron: Se oni scias kie objekto kuŝas, ĉu oni povos diri ke ĝi estas perdita?

Neniel, respondis la ŝipestro.

Nu, via arĝenta kraĵoningo ne estas perdita, ĉar mi scias ke ĝi kuŝas sur la fundo de la maro.

E.L.

## VIVO DE MARISTO.

En nokt' okazis uragan',  
 La maron montigante ;  
 Tabakon maĉis Barni Bunt,  
 Al Bolin Bill dirante—  
 " Nordokcidenta blovas, Bill,  
 Ĉu vi ĝin aŭdas brui nun ?  
 Helpu ilin Di', bedaŭras mi  
 Bordanojn malfeliĉajn nun !

Urbanaj malsaĝuloj, kun  
 Danger' en ĉiu vento,  
 En lito mem tremadas nun,  
 Ke falu la tegmento !  
 Mizeraj ja envias nin,  
 Mi kredas, dezirante  
 La sorton kiun trafis ni,  
 Sur ocean' estante !

Kaj kiuj pri aferoj en  
 La strato promenadas,  
 Por kisi familion, jen,  
 Nun hejmen rapidadas ;  
 Dum sur ferdeko vi kaj mi  
 Kusigas kun plezuro,  
 Ekflugas cirkaŭ ili nun  
 Fumpotoj sen mezuro !

Maranoj ofte audis ni,  
 Ke homoj perdas monon,  
 Kaj riskas eĉ la vivon, se  
 Veturas en Londonon ;  
 Landanoj timas, scias ni,  
 Nobeloj aŭ vestistoj ;—  
 Ĉielon danku, vi kaj mi,  
 Ke estas ni maristoj !"

*Tradukis B. ELMY.*

## A SAILOR'S LIFE.

One night came on a hurricane,  
 The sea was mountains rollin',  
 When Barney Buntline turned his quid  
 And said to Billy Bowlin'—  
 " A strong nor'wester's blowin', Bill,  
 Oh, don't you hear it roar now ?  
 Lord help 'em, how I pities all  
 Unhappy folks on shore now !

Foolhardy chaps as lives in towns,  
 What dangers they are all in ;  
 And now a'tremblin' in their beds,  
 For fear the roof should fall in !  
 Poor creatures, how they envies us,  
 And wishes, I've a notion,  
 For our good luck in such a night,  
 To be upon the ocean !

And then, for them kept out all day  
 On business from their houses,  
 Who late at night are hurryin' home  
 To cheer their babes and spouses,—  
 While you and I upon the deck  
 Are comfortably lyin',  
 My eyes, what tiles and chimbley-pots  
 About their heads are flyin' !

We seamen, too, have often heard  
 How men are sold and undone  
 By overturns in carriages,  
 And thieves and fires in London ;  
 We know what risks all landsmen run,  
 From noblemen to tailors ;  
 So, Bill, let us thank Providence  
 That you and I are sailors !"

*CAPT. W. PITT, R.N.*

PERLOJ EN DEZERTO.—Arabo, vojperdinte en la dezerto, kaj jam nenion manĝinte de du tagoj antaŭe, sentis sin ekmorti per malsato. Pasante apud puto, kie la karavanoj trinkigas siajn kamelojn, li ekvidis sur la sablo lederan saketon. Li ĝin prenis kaj palpis. "Estu Dio laŭdata!" li diris; "kompreneble en tio estas aŭ daktiloj aŭ aveloj." Plena je tia dolĉa espero, li rapidas malfermi la saketon, sed vidante ĝian enhavon, "Ho ve!" li ekkriis, "estas nur perloj!"—(6266).

## DIO, SAVU LA REĜON.

Nian Noblan Reĝon,  
 La gracian Reĝon,  
 Dio savu !  
 Estu li venkinta,  
 Feliĉa, glorinda,  
 Longe li reĝadu,  
 Dio, lin savu !

Sinjur' Di' starigu,  
 Malamikojn pelu  
 Kaj faligu !  
 Disig' politikon,  
 Venku friponaĵon,  
 Al Ci ni konfidu ;  
 Dio nin savu !

Donacojn plej karajn  
 Al li donu multajn.  
 Li reĝadu !  
 Leĝojn li defendu  
 Kaj por ni ebligu  
 Kore-voce kanti  
 Reĝon savu Di'.

*(Tradukis E.L.).*

## NIAJ FREMDAJ KUNBATALANTOJ.

Nia Kara Estro, Doktoro Zamenhof, skribis al ni sekvantan—

“Skribi artikolon por la Angla-Esperanta gazeto mi bedaŭrade havas nenian eblon, ĉar mi estas tiel treege okupata, ke mi ne havas eĉ unu liberan minuton. Mi deziras al la gazeto la plej bonan sukceson kaj mi esperas, ke la gazeto baldaŭ trovos tre multe da bonaj kunlaborantoj.”

Ni treege bedaŭtras ke la bona Doktoro ne povos skribi iom por ni, sed korege ni lin dankas por lia afabla bondeziro al nia sukceso.

\* \* \*

Ni ankaŭ ricevis tre afablan leteron de So. de Beaufront, por kiu ni lin dankegas. Jen ĝi estas. “Nepo de anglino, mi konas pli multe de aliaj la karakteron anglan. Mi do ne miras ke Esperanto estas tre favore akceptata de viaj sampatrujanoj kaj eĉ mia profunda konvinko estas, ke Anglujo influos tute aparte sur la finan venkon de Esperanto. La Angloj havas la juĝadon tro sanan por ne kompreni, ke nur en lingvo neŭtrala troviĝas la praktika solvo de lingvo internacia. Aliparte, antaŭ sistemo tiel simpla, kiel Esperanto, antaŭ lingvo kies duono da vortoj almenaŭ estas jam antaŭe konataj de ili, viaj samlandanoj nepovas malŝati rimedon de internacia komunikigado kiun malgraŭ ĉio ilia patra lingvo neniam povus doni. Pro tio mi tute konfidas ke ilia karaktero logika kaj praktika turnos ilin al ni kaj faros el ili bonegajn rekrutojn por Esperanto.— L. de B.

\* \* \*

Sinjoro Fruictier skribis al ni “En Novembro de 1903a j. aperos la unua No. de Internacia Medicina Revuo,” sesonjara organo en Esperanto, kies redakcia komitato konsistas el Profesoroj en Pariza Medicina Fakultato. Ĝia jaro abonkosto estas 6/6. . . . Ni sendos provajn ekzemplerojn kun gramatiko de Esperanto al plej multaj scienculoj. Sed por tio ni bezonas Monon kaj Kunlaboradon. . . . Al ĉiuj, kiuj abonos antaŭ la apero de la unua No. ni sendos senpage unu ekzempleron de “Esperanta Sintakso laŭ verkoj de Doktoro Zamenhof.” Plie, ilia abono daŭros dum tuta jaro 1904a, kia ajn estos nombro de N-oj aperontaj ĝis fino de tiu ĉi jaro. . . . Tial konfidante vian konatan Esperantistan fervoron, mi antaŭe plej kore vin dankas, kaj humile salutas.”

Certege ni esperas ke la venonto estos sukcesplena kaj ke Sinjoro Fruictier trovos multe da abonantoj kaj *kunlaborantoj* inter niaj scienculaj adeptoj.

(Subscriptions are received by the Hon. Sec., Esperanto Club).

Manuscript contributions should be sent to So. Paul Fruictier, 27 Boulevard Arago, Paris.

So. A. Saint-Martin, la tre sindonema helpanto kaj Redaktoro de la Kanada gazeto “La Lumo” skribis tre interesan leteron. Li diras “Brave! Brave! Brave! Mi gratulas vin sincere. . . . Hodiaŭ mi ricevas vian sciigon ke ne sole estos Angla eldono de jam fondita revuo, sed tute nova organo. Bravege! Mi memoras ke kelkaj amikoj Kanadaj iam diskutis kiam estos Angla Esperanta revuo. In diris post 50 jaroj, alia post 40 jaroj, mi kuraĝis diri, post dek jaroj oni en Anglujo mem eldonos Esperantan Gazeton. La tutaj ĉeestantoj ekridegis, kaj hodiaŭ, post unu jaro, vi anoncas al mi la bonan novaĵon! . . . Diru al amikoj en Anglujo ke ili sendu poŝt-kartojn al la Virina Klubo Progreso, 137a rue Sainte Elizabeth, Montreal, Canada. Tiu Klubo estas la unua virina Esperantista, ĝi fondis Esperantan ekspozicion, kaj sendas kiel respondo al ricevitaj kartoj, grupan portreton de kelkaj membroj de la Klubo. Tiu ekspozicio farota en la montrfenestro de unu el la plej gravaj ĉiutagaj ĵurnaloj en Montrealo, certe multe helpos al nia afero. Mi premas korege vian manon.— Via A. Saint-Martin.

Ni kore ĝojas ke la profetaĵo de niaj Kanadaj Samideanoj ne estas bona. La patrinalando ne estas tiel malantaŭema kiel oni pensis.

Ankaŭ ni salutas kore la Virinan Klubon kaj esperas ke la ekspozicio estos tute sukcesplena.

\* \* \*

Nia Sveda Kunlaboranto, Sinjoro Ahlberg skribis—“Mi ne povas eviti prezenti al vi miajn sincerajn komplimentojn pro la grandiozaj rezultatoj de via admirinda propaganda tie en Anglujo! . . . “Kiu estus povinta kredi tion antaŭ unu jaro” kriis al mi malnova Esperantisto, kiu, pro sia speciala scienco, la financo, zorge studiadis la anglajn kaj amerikanajn rilatojn. . . . Laŭ mia deziro, li nun estas publikigonta senpage nomarojn pri eksterversedaj komercistoj, kiuj deziras, per Esperanto, ekzistigi komercajn rilatojn kun svedaj firmo, firnoj kaj letere sciigos tion ĉi al mi.—Al vi kaj al via klubo kunfratajn salutojn.

### LA HUMORA FLANKO DE TELEGRAFO.

Se oni kolektus depeŝojn kiuj trakuras telegrafan ferfadenon, diras unu praktika telegrafejestro de vasta telegrafa sistemo, ili farus kuriozan kaj interesan volumon de korespondadoj. La kosto de la forsendo de depeŝo dependante de la nombro de vortoj kiujn ĝi enhavas kompreneble igas ĝian konstruaĵon kiel eble plej mallongan. Plej multaj depeŝoj enhavas malpli ol dek-du vortoj (kune kun adreso kaj subskribo), kaj estas mirinde kiom da materialo tiu ĉi malgranda nombro de vortoj ofte enhavas.

SinJORINO, kiu deziris ekscii kiam ŝia edzo revenos hejmen, sendis al li depeŝon demandante tion. Li respondis ke grava afero malhelpis lin, kaj ke li ne povos reveturi ĝis post kelkaj tagoj.

La SinJORINO tuj respondis sendante al li alian depeŝon en sekvanta lakonika stilo:—"Hejme. 12 Septembro, 1903; Al F.C.P. Depeŝo ricevita. Deŭtronomio xxiv., 5."—MARIO.

Turninte al la nomita verso en Sankta Skribo, la adresito legis sekvantan longan leteron:—

"Se oni edziĝis oni ne devas eliri por militi, nek devas oni klopodiĝi pri ia afero; sed oni devas resti hejme libera dum unu jaro, kaj oni devas ĝojigadi la edzinon kiun oni edzinigis."

Dua ekzemplero estas respondo sendita al homo kiu estis pekinta kontraŭ la leĝoj kaj kiu forkuris. Li deziris ekscii ĉu estus prudente reveni. Tial li telegrafis je sekvanta stilo:—

"1 Oktobro, 1903; Al B.C.M. Ĉu ĉio estas O.K.?"—D.T.M.

Kaj li ricevis sekvantan mallongan respondon:—"Al D.T.M. 1 Oktobro, 1903. Proverboj xxvii., 12."—B.C.M.

Turninte al la nomita verso la sciama individuo ricevis vere sekvindan konsilon:—

"Prudentulo antaŭvidas malbonon, kaj kaŝiĝas; sed naivuloj antaŭeniradas kaj estas punitaj."

*Tradukis C. F. HAYES.*

### THE HUMOUROUS SIDE OF TELEGRAPHY.

Were one to collect despatches which pass over the telegraph line, says a practical manager of a great telegraphic system, they would make a curious volume of correspondence. The cost of the transmission of a message depending upon the number of words it contains of course renders its construction as brief as possible. Most despatches contain less than a dozen words (together with an address and signature), and it is marvellous how much matter this small number of words often contains.

A lady, who wanted to ascertain when her husband would return home, sent him a message making the enquiry. He replied that a serious matter hindered him, and that he would not be able to return for some days.

The lady immediately replied by sending another message in the following laconic manner:—"Home. 12 September, 1903; To F.C.P. Message received. Deuteronomy xxiv., 5."—MARY.

Having turned to the specified verse in the Word, the addressee read the following long epistle:—

"When a man hath taken a new wife, he shall not go out to war, neither shall he be charged with any business; but he shall be free at home one year, and shall cheer up his wife which he hath taken."

A second specimen is a reply sent to a man who had committed an offence against the law and had absconded. He wanted to find out whether it would be prudent to return. He therefore telegraphed in the following style:—

"1 October, 1903; To B.C.M. Is all O.K.?"—D.T.M.

And he received the following brief reply:—

"To D.T.M. 1 October, 1903. Proverbs xxvii., 12."—B.C.M.

Having turned to the verse mentioned, the enquirer received good counsel:—

"A prudent man foreseeth the evil, and hideth himself; but the simple pass on and are punished."

Kiel marŝas la Lapoj? Ne kapo malsupre, mi pensas! Ne, ili piediras per la plando sur Laplando (*plando, sole of the foot*).

E.L.

*Maljuna Soldato*: Ĉu vi deziras esti heroo, knabeto?

*Knabeto*: Ne dankon! Mi ne deziras havi nur unu brakon kaj okulon artefaritan!

G.C.L.

BONVENO.

Gazeto Angla Esperanta, iru  
Antaŭen en la mondon, kunhelponte  
Kolegojn viajn ĉiam sendi vortojn  
De amikeco kies sono dolĉa  
Eniru en la korojn de la homoj  
Kaj ligan sanktan de frataro fari.

No. 8380.

## CORRESPONDENCE PAGE.

O.A., of York, writes:—"I want to head my notepaper with a notice that I am willing to receive correspondence in Esperanto. What is the best phrase to use?"

We think that "Mi korespondados Esperante" is best, being to the point and short.

Several correspondents have enquired whether it is easy to teach one's self Esperanto. This depends on the learner. But I will give two communications received to-day (September 4). Many similar letters of appreciation arrive every week.

(1). "Kara Sinjoro, Mi komencis lerni Esperanton la lastan Sabaton el (je?) la libreto *Esperanto*, kaj mi aĉetis mardon la 'Complete Text-Book' de Sinjoro O'Connor. Mi jam estas konvinkita ke la nova lingvo internacia estas perfekte praktika, kaj ke ĝi fariĝos grandan gajnon por la mondo se ĝi ricevos la atento kiun ĝi meritas. Kun saluto."

A.G.E., London, N.

This is, word for word, the Esperanto letter of a five-days' student. It would be interesting to see a similar production after an equally short period of self-tuition in any natural language. "Atento" instead of "atenton" seems to be the only slip!

(2). "Dear Sir,—I received the books safely yesterday morning. . . . I think Esperanto a most wonderful language. I shall soon translate the letters (for enrolment in the Adresaro) and send them in. I have never been so surprised as when I glanced through the text-book. I thought it would take at least 30 or 40 hours to master the grammar, but I find I can do it in 2! You will probably be rather surprised when you hear that I am only 14 years old. Yours truly, W.G.R., Montmorency, France."

We wish him every success, and hope soon to receive an Esperanto note also.

G.M.H., London, N.W., writes in Esperanto asking for "rules for the order of the words in Esperanto."

For an affirmative sentence the English order is generally the best. For questions, however, the order is not inverted. Ĉu mi havas libron? not Havas mi libron?

A most enthusiastic Sussex Samideanino writes: "I may never be able to do much—my age (71) precludes the possibility; but what I can do will give me the greatest possible pleasure."

M.A., of Weymouth, says: "I am in a slight difficulty. . . . What is the pronunciation of the plural termination *OJ*?" Unfortunately this point was not sufficiently clear in the first edition of the Text-Book. The sound is monosyllabic as in TOY. The tonic accent therefore falls on the preceding syllable. The termination of adjectives follows the same rule.

A.F.M., of Inverness, wonders whether we are desirous of receiving advice, and says that we should have "at least a column interlined with *Hugo's* method of illustrating pronunciation, and another with the literal translation of each word just below."

We are only too glad to receive suggestions from our good friend A.F.M. Perhaps he and similarly-minded enquirers are able to read shorthand. If so, the anecdote printed in *Pitman's* system will suffice. If not, we will see what can be done next month. As for the second suggestion, that is embodied already; the parallel-column translations are as literal as possible.

W.F., of Beith, asks: "Is the 'k' in such words as 'knabo,' 'kvar,' etc., sounded as in the English word 'knife'?"

This is another point which is frequently referred to as a difficulty. In Esperanto there are no silent letters. Therefore this "k" must be sounded, and not be silent as in the English word given. Students of German will recognise the sound in the word "knabe."

## DIVERSAJ SCIIGOJ.

Ĉi tie Londone ni ricevis tre interesajn vizitojn de multaj fremdaj samideanoj. Vere estas mirinde ke jen tute ne estas malsameco de elparolado inter la diverslandanoj kun kiuj ni ĝis nun paroladis. Plezurege ni nun renkontis Esperantistojn el Francujo, Italujo kaj Bohemujo. Tiu ĉi ofta intersaĝo de pensoj kun personoj kiuj antaŭe estis apartigitaj per manko de komuna lingvo certe estas unu el la plej grandaj plezuroj kiujn Esperanto donas al siaj adeptoj. Ni korege esperas ke ni baldaŭ vidos multajn fremdajn kunlaborantojn.

Vicprezidanto de la Hispana Societo skribis al ni kaj sendis afablajn bondezirojn je la estonta sukceso de nia granda entrepreno. Li ankaŭ sciigas nin ke oni eldonos Novembre novan Esperantan gazeton "La Hispana Suno." Ke ĝi estos sukcesplena, ni esperegas. Sed Hispanujo ne estas la sola lando kiu havas novan organon. Malproksima Peruo ĵus eldonis "Antaŭen Esperantistoj!" Vere feliĉa nomo por la naskinto, kaj ni fidas ke la Peruanoj respondos al la devizo, kaj rapide antaŭmarŝos.

Sudameriko ŝajnas esti bona loko por Esperanto, ĉar ni ĵus ricevis sciigojn pri la fondo de nova grupo en Santiago, Ĉile. La Direktoro estas Sinjoro E. Sepulveda Cuadro, Profesoro de Fonetiko.

Sed ne estas necese ke oni serĉos Sudamerikon por eltrovi pruvojn de la progreso de Esperanto. Niaj amikoj en Keighley—elparolata Kihli—havis sian jarkunvenon post tre aktiva vivo de dek monatoj. Vere ili faris grandan propagandon, ĉar, kvankam la urbo ne estas granda, jen estas preskaŭ sesdek Esperantistoj tie. Eble estas pli facila afero disvastigi la lingvon en urbeton kie ĉiu konas siajn najbarojn, sed, ĉu tiu ĉi estas vera aŭ ne, oni devas gratulegi la Kihlian Societon pri ĝia rapidega kresko.

Ankaŭ ĉi tie ni havas novajn societojn. Je la lasta tago de Septembro, nia tre sindonema helpanto, Sinjoro Clephan, paroladis pri Esperanto ĉe la Literary and Philosophical Institute, Newcastle-on-Tyne. Jen estis okdek ĉeestantoj, kaj, post la parolado, dudek el ili deziris grupiĝi. Tiel nia plej norda Angla Grupo naskis. Ni petas ĉiujn kiuj loĝas en aŭ apud tiu urbo ke ili aliĝu al la nova societo.

Nia tre agema kunlaboranto, Sinjoro Motteau, ĵus fondigis la "Forest Gate Esperanto Group." Ni petas ke oni skribu al la Hon. Sek. de la Grupo, Sinjoro E. J. R. Beal, 74, Claremont Road, Forest Gate. Niaj amikoj tie tre deziras ke ili povus havi la uzon de taŭga ĉambrego en kiu So. A. Motteau volonte donus senpagan kurson de Esperanto.

La tre entuziasma propagandisto Sinjoro Thill, 6, Barton Crescent, Mannamead, Plymouth, ankaŭ deziregas ĉambregon kie li povos doni senpagan instruadon. Ni korege esperas ke ia amiko povos helpi niajn du kunlaborantojn.

Doktoro R. J. Lloyd, D.Litt.M.A., komencis Esperantan kurson ĉe la Liverpool Universitato je Oktobro 14. Ni fidas ke multaj lernantoj venos tie, kaj ke la entrepreno estos sukcesa. Ŝajnas al ni ke estas notindege ke Angla Universitato malfermis kurson.

Doktoro Adolf von Mayer estas la aktivega estro de la Esperanta movado en Manchester. Unu el liaj lernantoj baldaŭ komencos kurson en Japonujo. Jen estas multaj fremduloj en la Manchester Grupo, kaj ni kredas ke ĝi kreskos rapide.

Ni petas ke amikoj skribos al Sinjoro E. W. Eagle, 21, Kellett Road, Brixton, S.W. Ankaŭ al Sinjoro P. G. Bacon, 170, Clapham Park Road, S.W. Tiuj ĉi sinjoroj estas la sekretarioj de novaj grupoj por studii Esperanton. En Ilford Sinjoro W. A. Jeffery deziras fondi grupon. Lia adreso estas 42, Park Road, Ilford, kaj li fidas ke oni skribos al li pri la afero.

### GRAVA AVISO.

La senpagaj kursoj de la Esperanto Klubo nun komencos. Ni devas treege danki la sindonemajn gesinjorojn kiuj aminde donas ilian tempon por disvastigi Esperanton, kaj la plej malgranda honoro kiun oni povos fari je ili estas zorgi ke la kursoj estos sukcesplenaj. Ni do petegas ke kiel eble plej multe ĉeestos.

Lunde jen estos kurson de Sinjoro O'Connor ĉe "The Gouin School of Languages," 34, Harrington Road, S.W. (quite close to the South Kensington Metropolitan Station), 6.45 p.m.

Ĵaŭde kurson de Fraŭlino Schäfer kaj Sinjoro Goody ĉe "The Gouin School of Languages," 16, Finsbury Circus, E.C., 6.30 p.m.

Vendrede ĉe Sinjoro C. F. Hayes, 48, Swanage Road, Wandsworth, S.W., 7.30 p.m.

Tiu ĉi gravega sciigo ne estas kompleta sen korega dankesprimado al Sinjoro Thémoiné, kiu aminde permesis ke ni uzus la ĉambregon de la Gouin School, kaj ankaŭ al Sinjoro Hayes, kiu havas kurson ĉe sia domo.

Je la dua Lundo, ĉiumonate, adeptoj kunvenas ĉe Mowbray House, Norfolk Street, Strand, por la "Reading Circle."



## NIAJ BONEGAJ AMIKOJ.

Du Esperantistaj amikoj foje disputadis pri la nuntempa vivado, ĝiaj utiloj kaj malutiloj. Ili promenadis sur belega vojo tra aleo de arboj, kaj je la malproksima vidaĵo estis monteto kovrita per florantaj herboj kaj brilanta sub sennuba ĉielo.

“Antaŭe tiu ĉi vidaĵo estis tiel bela kiel hodiaŭ” diris unu el ili. “Jes” respondis la alia sed tiam ni marŝus tremante, ni timus rabistojn aŭ mlitistojn de ia granda barono. Vojo estus malbona kaj certe ni ne havus pluvombrelojn se pluvus.”

“Ĉu la nuna tempo kaj ĝia senĉesa aktiveco, ĝiaj bezonoj, ĝia preskaŭ lukso por malriĉuloj estas egale bona por krei fortan kaj nobelan karakteron? Ĉu vi ne kredas ke simpleco estas la plej bona por ĉiuj?” “Ne” respondis la alia, “ni havas edukecon kaj ĵurnalojn.” “Ĵurnalojn” kun akcento de grandega malestimo. “Ĵurnaloj estas similaj je ventoflagoj aŭ vaporfajfoj; nur utilaj por montri kien blovas la vento, aŭ por fari bruon. Vidu do kion ĵurnaloj diras pri Esperanto!”

Unue ili legis en la “Daily News”: “But we are inclined to think that Esperanto, having no literature and no vital connection with daily living to enrich and refine and subtilize it, would be a poor language, in which it would be well nigh impossible to communicate any ideas but the simplest and most commonplace.”

Tiam ili malfermis la “Daily Chronicle” kaj legis: “A gathering of forty or fifty members gave a hearty welcome to the visitors, and the facility of comprehension and of speech on both sides was a revelation.”

Alia ĵurnalo kiun ili legis estis la “Daily Telegraph” kie oni trovis la sekvantan mallongan kritikajon “Its meagre scant array of words Could puzzle no beginner; Untutored cannibals by herds, Would learn them after dinner.”

La “Glasgow Times” diris “I fear that even the enthusiastic W. T. Stead will not gain many disciples for Esperanto.”

En la “World’s Work” ili legis “There seems little doubt that Esperanto is at present holding the field against many rivals.”

La “General Practitioner” presis “It is good for the general cause of an International language that Esperanto should be propagated as much as possible.”

La du amikoj legis kvardek ĵurnalojn kaj trovadis similajn diversajn kritikojn pri la kara lingvo.

E. A. LAWRENCE.

[Vere la nuna sukceso de la Esperantista movado ŝuldas al ĵurnaloj grandan ŝuldon. Sen la helpo kiun ĝi ricevis; precipe de la *Revue de Revues*, *T.P.’s Weekly* kaj similaj eldonoj, Esperanto en Anglujo ne estus tiel disvastigata kiel ĝi hodiaŭ estas. Unua ekzemplero de la *Esperanta Gazeto* ne estus kompleta sen korega dankesprimo, kaj la espero ke ĉiamkreskanta nombro de ĵurnaloj estados niaj “Bonegaj Amikoj” en tiu ĉi bonfarada movado.—EDITOR’S NOTE].

## KELKAJ FABLOJ EL ESOPO.

LA ALAŬDO KAJ ALAŬDIDOJ.—En kampo da matura greno troviĝis kovitaro de alaŭdidoj, kaj la patrino ĉiutage atendis la venon de la rikoltistoj. Ĉiufoje kiam ŝi foriris, ŝi ĉiam diris al siaj geidoj ke ili rakontu al ŝi ĉion, kio okazos dum ŝi forestis. En tago, alvenis la mastro. “Estas nun la tempo voki ĉiujn miajn najbarojn,” li diris, “kaj rikolti mian grenon.”

Kiam la maljuna alaŭdo aŭdis pri tio, ŝi diris al siaj idoj: “Se li fidas je siaj najbaroj, li ne baldaŭ rikoltos sian grenon.”

La proksiman tagon, la bienulo revenis, kaj vidante nenion faritan, li diris al sia filo: “Iru kaj voku viajn onklojn kaj kuzojn, por ke ili komencu morgaŭ.” Sed la alaŭdo diris al siaj idoj ke ili ne timu, “Ĉar,” ŝi rimarkis, “la parencoj ankaŭ havas siajn kampojn da matura greno, kiujn ili devas rikolti.”

Ŝi denove forestis, kaj la mastro, venante kiel antaŭe, nun diris al sia filo: “Ni mem laboru kaj komencu morgaŭ nian rikolton.”

Kiam la alaŭdidoj rakontis tiuniron al la patrino—“Nun,” diris ŝi, “ni vere bezonas forflugi.”

“Kion vi deziras farita, tion vi mem faru.” (6266).

LA AZENO EN LEONA HAŬTO.—Azeno, vestita je leona haŭto, fiere vagadis kaj timigis ĉiun el la timemaj bestoj kiujn li renkontis en la ĉirkaŭaĵo. Ekvidante vulpon, li ankaŭ volis malkvieti tiun ĉi. Sed Rejnardo, aŭdinte la azenanbruan voĉon, diris:—“Nu, ja, mi ankaŭ timiĝus se mi ne ĵus aŭdinta vin bleki.”

“Trompantoj ĉiam estos eltrovitaj.”

(69)

*In order that this Gazette may be useful as a propaganda agent, it has been considered advisable to include in each number a synopsis of the Grammar of Esperanto, so that those hitherto ignorant of its system may be the better able to appreciate the magazine.*

## SYNOPSIS OF THE GRAMMAR.

The ALPHABET is composed of 28 letters. They are the following:—

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U V Z and Ŭ.

The VOWELS are always given a long sound; as in the well-known phrase, "Pa, may we go too?" Shorthand students will at once recognise them as the long vowels of "Pitman." Their sound can also be illustrated by—"Bart, Bait, Beat, Boat and Boot."

The following CONSONANTS need special attention. It must be remembered that the sounds given are invariable, because *Esperanto spelling is phonetic and each letter has only one sound*:—

The letter C is sounded as in Czar, or as the "ts" in Bits.

|   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|
| " | " | Ĉ | " | " | Church.   |
| " | " | G | " | " | Gag; <i>i.e.</i> , the hard sound.                              |
| " | " | Ĝ | " | " | George; <i>i.e.</i> , the soft sound.                           |
| " | " | H | " | " | His; <i>i.e.</i> , it is aspirated and never mute as in French. |
| " | " | Ĥ | " | " | Loch; <i>i.e.</i> , the Scotch or German "CH" or Spanish "J."   |
| " | " | J | " | " | the English letter Y. Thus Paroloj is sounded Paroloy.          |
| " | " | Ĵ | " | " | the French J in Bijou or the S in the English word Pleasure.    |
| " | " | S | " | " | in Sun; never as in Rose (Rozo in Esperanto).                   |
| " | " | Ŝ | " | " | in She.   |

The English letters Q, W, X and Y do not exist in Esperanto.

The letter Ŭ is only found in diphthongs—Baldaŭ is sounded Bahldow.

The one remaining point to be mentioned is that "AJ" is the same as in By. "OJ" as in Boy.

ALL NOUNS end in O in the nominative singular. Birdo, a bird.

When the direct object to a verb, an N is added to this O. Mi havas birdon, I have a bird.

All nouns form the PLURAL by adding J to the singular. Birdoj, birds. If objective, birdojn.

All ADJECTIVES end in A and agree with the noun in number and case. Mi havas belajn birdojn, I have beautiful birds.

The INFINITIVES of VERBS always end in I. Lerni, to learn. Pensi, to think.

PRESENT INDICATIVES end in AS in all persons singular and plural. Mi iras, I go. Ili iras, they go.

PAST INDICATIVES end in IS in all persons singular and plural. Mi iris, I went. Ni iris, we went.

FUTURE INDICATIVES end in OS in all persons singular and plural. Ŝi iros, she will go.

CONDITIONAL MOOD ends in US in all persons singular and plural. Li irus, he would go.

IMPERATIVE MOOD ends in U. Parolu! speak! Iru! go!

SUBJUNCTIVES are formed by using "KE" and the Imperative. Ke mi iru, that I might go.

The PRESENT PARTICIPLE ACTIVE ends in ANTA—Iranta, going. In the Passive voice in ATA—Farata, being done.

PAST PARTICIPLE ACTIVE ends in INTA—Irinta, having gone. In the Passive voice in ITA—Farita, having been done.

FUTURE PARTICIPLE ACTIVE ends in ONTA—Ironta, about to go. In the Passive voice in OTA—Farota, about to be done.

ADVERBS end in E—Bone, well. Bele, beautifully.

1. The DEFINITE ARTICLE is invariably LA in all cases singular and plural. La Patroj, the Fathers.

2. There is no indefinite article in Esperanto. Patro, a Father; or merely Father, as the case may be.

3. "NOT" is expressed by "NE." Mi ne havas amikon, I have not a friend.

4. Questions are introduced by "Ĉu." Ĉu mi ne havas amikon? Have I not a friend?

5. ESTI, to be, is the auxiliary verb in Esperanto. Havi, to have, is never an auxiliary.

N.B.—There are no exceptions or irregularities in Esperanto.

The VOCABULARY has been simplified by about 30 affixes, which are used to modify the meanings of root words. The commonest are the following PREFIXES :—

BO indicates relationship by marriage. Bofrato, Brother-in-law.  
 DIS indicates separation, as in English. Dissiri, to tear to pieces.  
 EK indicates the commencement of an action. Eklerni, to begin to learn.  
 MAL is always used to indicate OPPOSITES. Varma, warm. Malvarma, cool. Amiko, friend.  
 Malamiko, enemy.  
 RE denotes the repetition of an action. Relerni, to relearn. Rediri, to say again.

The principal SUFFIXES are the following :—

AĴ signifies an object made from—thus, Fruktajo, something made from fruit.  
 AR signifies a collection of. Arbo, a tree. Arbaro, a forest.  
 EBL signifies possibility. Videble, visibly. Lernebla, learnable.  
 EC signifies an abstract quality. Boneco, goodness. Beleco, beauty.  
 EG signifies increase. It is the augmentative suffix. Granda, large. Grandega, immense.  
 EJ signifies the place where an action takes place. Lernejo, school. Preĝejo, church.  
 ET is the diminutive suffix. Infaneto, a little child. Varmeta, lukewarm.  
 IG denotes the causing of an action. Morti, to die. Mortigi, to kill.  
 IĜ denotes turning or becoming. Paligi, to turn pale. Fortigi, to become strong.  
 IL denotes the instrument by which an action is performed. Kudri, to sew. Kudrilo, a needle.  
 IN denotes the feminine. Patro, father. Patrino, mother. Onklo, uncle. Onklino, aunt.  
 IST denotes the occupation, or means of livelihood. Botisto, bootmaker. Servisto, manservant.  
 UL denotes the possession of a Quality or Attribute. Blindulo, a blind man. Danculo, a dancing man.

By means of these affixes, the Vocabulary is enormously simplified.

---

All should have "The Student's Complete Text Book," 1s. 8d., post free, and "Twelve Exercises," 1s. 3d., in order to thoroughly learn the system; but the above is serviceable as a rough basis.

---

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.

The books most read are:—

"Student's Complete Textbook," by J. C. O'Connor, B.A., 1s. 8d., post free.

"Twelve Exercises with Key," by A. Motteau, 1s. 3d., post free.

"No. 52," a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d. the set.

"Hamlet," translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Complete Stories from back "L'Espérantistes," 2d. each.

"Tourist's Phrase-Book," in 6 languages, 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are:—

"La Lingvo Internacia," printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

"L'Espérantiste," in French and Esperanto, 4s.

"La Lumo," in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Belga Sonorilo," in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Bohema Esperantisto," in Czech and Esperanto, 3s.

"La Rondiranto," in Bulgarian and Esperanto, 3s.

The new "Internacia Medicina Revuo" will appear every two months. Subscription 6s. 6d. per annum.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries will be ready shortly. Price 2s. 6d. each.

"French-Esperanto Vocabulaire," 2s. 6d. ;  
 "Esperanto-French Dictionnaire," 1s. 6d.

"Braille Instruction-Book for the Blind," 4s.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.

*In order that this Gazette may be useful as a propaganda agent, it has been considered advisable to include in each number a synopsis of the Grammar of Esperanto, so that those hitherto ignorant of its system may be the better able to appreciate the magazine.*

## SYNOPSIS OF THE GRAMMAR.

The ALPHABET is composed of 28 letters. They are the following:—

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U V Z and Ŭ.

The VOWELS are always given a long sound; as in the well-known phrase, "Pa, may we go too?" Shorthand students will at once recognise them as the long vowels of "Pitman." Their sound can also be illustrated by—"Bart, Bait, Beat, Boat and Boot."

The following CONSONANTS need special attention. It must be remembered that the sounds given are invariable, because *Esperanto spelling is phonetic and each letter has only one sound*:—

The letter C is sounded as in Czar, or as the "ts" in Bits.

|   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|
| " | " | Ĉ | " | " | Church.   |
| " | " | G | " | " | Gag; <i>i.e.</i> , the hard sound.                              |
| " | " | Ĝ | " | " | George; <i>i.e.</i> , the soft sound.                           |
| " | " | H | " | " | His; <i>i.e.</i> , it is aspirated and never mute as in French. |
| " | " | Ĥ | " | " | Loch; <i>i.e.</i> , the Scotch or German "CH" or Spanish "J."   |
| " | " | J | " | " | the English letter Y. Thus Paroloj is sounded Paroloy.          |
| " | " | Ĵ | " | " | the French J in Bijou or the S in the English word Pleasure.    |
| " | " | S | " | " | in Sun; never as in Rose (Rozo in Esperanto).                   |
| " | " | Ŝ | " | " | in She.   |

The English letters Q, W, X and Y do not exist in Esperanto.

The letter Ŭ is only found in diphthongs—Baldaŭ is sounded Bahldow.

The one remaining point to be mentioned is that "AJ" is the same as in By. "OJ" as in Boy.

ALL NOUNS end in O in the nominative singular. Birdo, a bird.

When the direct object to a verb, an N is added to this O. Mi havas birdon, I have a bird.

All nouns form the PLURAL by adding J to the singular. Birdoj, birds. If objective, birdojn.

All ADJECTIVES end in A and agree with the noun in number and case. Mi havas belajn birdojn, I have beautiful birds.

The INFINITIVES of VERBS always end in I. Lerni, to learn. Pensi, to think.

PRESENT INDICATIVES end in AS in all persons singular and plural. Mi iras, I go. Ili iras, they go.

PAST INDICATIVES end in IS in all persons singular and plural. Mi iris, I went. Ni iris, we went.

FUTURE INDICATIVES end in OS in all persons singular and plural. Ŝi iros, she will go.

CONDITIONAL MOOD ends in US in all persons singular and plural. Li irus, he would go.

IMPERATIVE MOOD ends in U. Parolu! speak! Iru! go!

SUBJUNCTIVES are formed by using "KE" and the Imperative. Ke mi iru, that I might go.

The PRESENT PARTICIPLE ACTIVE ends in ANTA—Iranta, going. In the Passive voice in ATA—Farata, being done.

PAST PARTICIPLE ACTIVE ends in INTA—Irinta, having gone. In the Passive voice in ITA—Farita, having been done.

FUTURE PARTICIPLE ACTIVE ends in ONTA—Ironta, about to go. In the Passive voice in OTA—Farota, about to be done.

ADVERBS end in E—Bone, well. Bele, beautifully.

1. The DEFINITE ARTICLE is invariably LA in all cases singular and plural. La Patroj, the Fathers.

2. There is no indefinite article in Esperanto. Patro, a Father; or merely Father, as the case may be.

3. "NOT" is expressed by "NE." Mi ne havas amikon, I have not a friend.

4. Questions are introduced by "Ĉu." Ĉu mi ne havas amikon? Have I not a friend?

5. ESTI, to be, is the auxiliary verb in Esperanto. Havi, to have, is never an auxiliary.

N.B.—There are no exceptions or irregularities in Esperanto.

The VOCABULARY has been simplified by about 30 affixes, which are used to modify the meanings of root words. The commonest are the following PREFIXES :—

BO indicates relationship by marriage. Bofrato, Brother-in-law.  
 DIS indicates separation, as in English. Dissiri, to tear to pieces.  
 EK indicates the commencement of an action. Eklerni, to begin to learn.  
 MAL is always used to indicate OPPOSITES. Varma, warm. Malvarma, cool. Amiko, friend.  
 Malamiko, enemy.  
 RE denotes the repetition of an action. Relerni, to relearn. Rediri, to say again.

The principal SUFFIXES are the following :—

AĴ signifies an object made from—thus, Fruktajo, something made from fruit.  
 AR signifies a collection of. Arbo, a tree. Arbaro, a forest.  
 EBL signifies possibility. Videble, visibly. Lernebla, learnable.  
 EC signifies an abstract quality. Boneco, goodness. Beleco, beauty.  
 EG signifies increase. It is the augmentative suffix. Granda, large. Grandega, immense.  
 EJ signifies the place where an action takes place. Lernejo, school. Preĝejo, church.  
 ET is the diminutive suffix. Infaneto, a little child. Varmeta, lukewarm.  
 IG denotes the causing of an action. Morti, to die. Mortigi, to kill.  
 IĜ denotes turning or becoming. Paligi, to turn pale. Fortigi, to become strong.  
 IL denotes the instrument by which an action is performed. Kudri, to sew. Kudrilo, a needle.  
 IN denotes the feminine. Patro, father. Patrino, mother. Onklo, uncle. Onklino, aunt.  
 IST denotes the occupation, or means of livelihood. Botisto, bootmaker. Servisto, manservant.  
 UL denotes the possession of a Quality or Attribute. Blindulo, a blind man. Danculo, a dancing man.

By means of these affixes, the Vocabulary is enormously simplified.

---

All should have "The Student's Complete Text Book," 1s. 8d., post free, and "Twelve Exercises," 1s. 3d., in order to thoroughly learn the system; but the above is serviceable as a rough basis.

---

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.

The books most read are:—

"Student's Complete Textbook," by J. C. O'Connor, B.A., 1s. 8d., post free.

"Twelve Exercises with Key," by A. Motteau, 1s. 3d., post free.

"No. 52," a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d. the set.

"Hamlet," translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Complete Stories from back "L'Espérantistes," 2d. each.

"Tourist's Phrase-Book," in 6 languages, 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are:—

"La Lingvo Internacia," printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

"L'Espérantiste," in French and Esperanto, 4s.

"La Lumo," in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Belga Sonorilo," in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Bohema Esperantisto," in Czech and Esperanto, 3s.

"La Rondiranto," in Bulgarian and Esperanto, 3s.

The new "Internacia Medicina Revuo" will appear every two months. Subscription 6s. 6d. per annum.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries will be ready shortly. Price 2s. 6d. each.

"French-Esperanto Vocabulaire," 2s. 6d. ;

"Esperanto-French Dictionnaire," 1s. 6d.

"Braille Instruction-Book for the Blind," 4s.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.

## L'Espero.

Himno de  
DRO. ZAMENHOF.Marŝa Muziko de  
Esperantisto 6266.

En la mon-don ve-nis no-va sent-o, Tra la mon-do ir-as fort-a vo-ko

*prokraste.* Per flu-gi-loj de fa-ci-la ven-to Nun de lo-ko flu-gu ĝi al lo-ko!  
*Fino.*

Me al gla-vo san-gon soi-fan-ta Ĝi la ho-man ti-ras fa-mi-li-on

*malakcele.* Al la mond'e-terne mi-li-tan-ta Ĝi pro-mesas sanktan harmo-ni-on.  
*D.K.*

Sub la sankta signo de l'espero  
Kolektigas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.  
En la mondon, &c.

Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj;  
Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Per la sankta amo disbatitaj.  
En la mondon, &c.

Sur neutrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.  
En la mondon, &c.

Nia diligenta kólegaro  
En laboro paca ne lacigos,  
Ĝis la bela sonĝo de l'homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.  
En la mondon, &c.

No. 2.

THE

December, 1905.

# ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the spreading  
of the International Language.

MANAGED BY H. DR. LUDWIG LEONARDI.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Published by THE ESPERANTISTS (1905), 41, Dorset Temple, London, W.C.

## CONTENTS.

|  | Page  |
|--|-------|
| GENERAL NOTICE ... ..  | 17-18 |
| WHAT HAS HAPPENED SINCE (Felix Michalides) ...                         | 19    |
| THE BEAUTIFUL MAID (C. Dickson) ...                                    | 20    |
| "THE THUNDER," continued from page 7<br>(translated by A. Mollath) ... | 21    |
| AN APPRENTICE HISTORY (Ben Boy) ...                                    | 22    |
| THE IRISH BERRY (Paul Mathews) ...                                     | 23    |
| THE THREE PARTS OF (Edna Baker) ...                                    | 24    |
| THE HISTORY OF A VOICE (J. Ellis) ...                                  | 25    |
| PROGRESS OF LEARNING ESPERANTO ...                                     | 26    |
| CHANGES IN OTHER LANGUAGES ...   | 27    |
| THE FUTURE ...   | 28    |
| THE ANIMAL AND THE CHILD (A. Mollath) ...                              | 29    |
| CONTEMPORARY NEWS ...  | 30    |
| FACTS FROM THE HISTORY ...   | 31    |
| SPRACHEN DER NEUEN WELT ...  | 32    |
| REVIEWS OF BOOKS ...   | 33-37 |

## The HON. SECRETARIES OF ESPERANTO SOCIETIES are

|   |
|---|
| BIRMINGHAM, J. P. H. Woodward, Esq.,<br>Newstead, 24, Bellfield Road. |
| DUBLIN, C. Fanning, Esq.,<br>1500, Association, 10, Stephens Green.   |
| EDINBURGH, Miss Tweedie, M.A.,<br>6, Spring Street.                   |
| GLASGOW, J. Hunter, Esq.,<br>128, Darnley Street, Pollokshields.      |
| HULL, G. H. Taylor, Esq.,<br>15, Victoria Hall Road.                  |
| KINGSLY, J. Ellis, Esq.,<br>Dunston Hall, Dunston, Bow Street.        |
| LONDON, H. Bellingham, Esq.,<br>41, Dorset Temple, W.C.               |
| MANCHESTER, Dr. A. van Marum,<br>Central Hall.                        |
| NEWCASTLE, R. W. Clifton, Esq.,<br>3, Rochdale Terrace, Gateshead.    |
| PLYMOUTH, J. A. Gull, Esq.,<br>8, Barton Crescent, Marazion.          |
| PORTSMOUTH, Dr. Greenwood,<br>21, St. George's Square.                |
| SURREY, P. Howard, Esq.,<br>The Bungalow, Cranley Park.               |

Advertisements should be sent to the publishers, and not to the secretaries of the societies, with the exception of those for the "Reviews of Books," which should be sent to the publishers.

# The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

*Unbound by ties of nationality:  
The common bond of union of all civilised peoples.*

The Remington can be supplied fitted for  
Esperanto.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

# La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMAŝINO.

*Pripensu je tio!*

LA INTERNACIA MAŝINO.

*Tute liberigita de naciaj ligiloj:  
La Komuna unuigilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.*

La Remington estas liverita kun Esperantaj  
presiltaretoj.

LA REMINGTON TYPEWRITER KOMPANIO,  
100, Gracechurch St., Londono, E.C.

## A NEW WORK

You should have to perfect your knowledge of Esperanto is the **just-published Esperanta Sintakso** lan verkoj de **Doktoro Zamenhof** kaj aliaj aŭtoroj.

Verkita de **PAUL FRUICHTER.** **NUR EN ESPERANTO.**

From THE ESPERANTO CLUB, 1/6 Post Free.

## We beg to remind our Readers

not to omit to translate the letters enclosed in the Text Book, and to send the translations to us with four penny stamps. **THE ADRESARO**—a list of Esperantists—will then be sent, by means of which one can correspond all over the world in Esperanto.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi en Esperanto.

Doktoro G. BASUTTI, Misida, Malta.

Interŝanĝos poŝtsignojn.

Rev. H. T. W. BUTLER, St. Paul's Vicarage, Middlebrough, Yorkshire.

Ĉiam respondos je ĉiuj demandoj.

H. W. CLEPHAN, Esq., 3, Cotfield Terrace, Gateshead.

Pri muzikaj aferoj.

Sinjoro C. CHARRIER, Calle Zabala, 77, Montevideo, Uruguay.

Kolektas ilustritajn poŝtkartojn. Ĉiam respondos.

Fri. V. DESPORTES, 17, Boulevard Voltaire Chaumont, Haute Marne, France.

J. A. D. HENDERSON, Esq., 97, Donegall St., Belfast, Ireland.

Alilandaj sistemoj de stenografio.

G. LEDGER, Esq., 9, Tancred Road, Endymion Road, Finsbury Park, London, N

L. LAROSE, Esq., 813, Mount Royal Avenue, Montreal, Canada.

Respondos je poŝtkartoj skribitaj en Esperanto.

M. MAURICE MARTIN, Studento ĉe la kolegio de Châteaudun (Eure et Loire), France.

C. G. STUART MENTZATH, Esq., 23, Upper Bedford Place, London, W.C.

Ĝardenaj Urboj kaj "Darwinismo" por la Homaro.

Sinjoro A. de MARICH, Budapest, IV. Realtanoda u. 5. 11/7 Hungary.

C. REEVE, Esq., 8, Effingham, Road, Lee, Kent.

Komercoj temoj kaj komercaĵo kun samlandanoj per stenografio Pitman.



This is a reduced facsimile of the design for an illustrated Postcard.

It is obtainable in two patterns, Inland and Foreign. All the finest quality ivory cards. Price for propaganda purposes, 1/1 for 50.

State whether Inland or Foreign are required.



# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAGOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
M. Paul Fruitier, 27, Boulevard Arago, Paris, France.  
A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal, Canada.  
M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai, Belgium.  
Herr Ahlberg, 50, Döbelngatan, Stockholm, Sweden.  
A. Agius, Esq., Strada S. Gaetano, 92, Hamrun, Malta.  
G. W. Messerly, Esq., Port-of-Spain, Trinidad, B.W.I.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtsignon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

No. 2.

DECEMBRO, 1903.

[Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net.]

## PRI LA ESTONTECO.

*"Neniu el ni estas senerara, eĉ la plej juna."*

La Redaktoro de THE ESPERANTIST dezirassendi, kiel eble plej frue, siajn koregajn dankesprimojn al sia legantaro pro la amindaj leteroj kiujn li tage ricevas. En la unua artikolo de la unua ESPERANTIST peto antaŭmetiĝis ke oni bonvolu sendi proponojn pri la plibonigo de la plej juna el Esperantaj Jurnalaj. Sekve, multaj amikoj skribis siajn pensojn pri la afero.

Por komenci je la komenco, kelkaj samideanoj kritikis la *verdeceto* de la kovrilo. Sed multajn leterojn ni ankaŭ ricevus, precipe de niaj legantinoj, tute aprobante ĝin. Ni do kredas ke estus bedaŭrinde ŝanĝi ĝin sen unuanima konsento, tial la dua kajero ankaŭ havas similan verdan eksteraĵon.

Sed la gravegaj kritikoj estis pri la internaĵo. Kelkaj legantoj trovis ke nedividata paĝo estis iom malfacila por legi. Precipe en la interesa originala verko "Itala Somero" ili tion eltrovis. Kvankam nedividataj paĝoj havas pli belan vidiĝon, ni ne daŭrigos ilin en la estonteco, kaj ni dankas la amikojn kiuj montris la malbonaĵon.

Adepto Esperantisto kredis ke la modelo estis tro alta; ke la dua Gazeto ne povus esti tiel interesa kiel la unua, k.t.p. Vere tio ĉi estus gravega afero, kaj Britaj Esperantistoj devas zorgi ke la profetaĵo ne estos prava. Ni estas tute certaj ke, se oni nur sendos ĉi tie kiel eble plej multaj artikoletoj—precipe originalaj verkoj—sufiĉe interesaj Gazetoj rezultos.

## CONCERNING THE FUTURE.

*"We are none of us infallible, even the youngest."*

The Editor of THE ESPERANTIST desires to send as early as possible his most hearty expression of thanks to his readers for the kind letters which he daily receives. In the first article of the first ESPERANTIST a request was put forward that one should send proposals for the improvement of the youngest of Esperanto journals. In consequence of this, many friends have written their opinions on the subject.

To begin at the beginning, some friends-in-Esperanto criticised the *somewhat greenness* of the cover. But we have also received many letters, especially from our lady readers, fully approving of it. We therefore think it would be regrettable to change it without unanimous consent; thus the second number has a similar green exterior.

But the most serious criticisms were concerning the interior. Some readers found that an undivided page was somewhat difficult to read. Especially in the interesting original work, "The Italian Summer," did they experience this. Although undivided pages have a more pleasant appearance, we will not continue them any more, and thank the friends who pointed out the defect.

An adept Esperantist thought the standard was too high; that the second Gazette could not be as interesting as the first, and so on. This truly would be a most serious matter, and British Esperantists must take care that the prophecy be not verified. We are quite certain that if one will only send as many articles as possible—especially original works—sufficiently interesting Gazettes will result.

La sama kritikisto ankaŭ opiniis ke ne estis sufiĉe da Angla lingvo en la unua numero. Ĝi enhavas nur dek ses paĝojn, kaj la plimulto de la legantaro deziras legi Esperantaĵojn, ne Anglaĵojn. Unu el niaj sindonemaj kunverkantoj promesis marki ĉiujn vortojn, kiujn ne troviĝos en la lernlibro, kaj ni ĉiam donos iliajn tradukojn. Tiamaniere ni esperas ke ni plaĉos tiujn, kiuj deziras vidi pli en la Angla lingvo, sen limigi la interesan enhavon.

Inter la amikoj kiuj skribis pri la granda celo de Esperanto, unu diris "Zenofono gvidis la perditajn Grekojn el la neterpoma<sup>1</sup> lando orienta de poezio, sablo kaj romanco. Kaj vi, mia samideano, devas, per via Gazeto, gvidi la sonĝajn Esperantistojn malsupren al la ĉiutagan landon de porkaĵo kaj faboj!"

Vere tiu ĉi estas bona konsilo, ĉar Esperanto devas esti "Pana kaj butera lingvo" por komerco kaj ĉiutaga vivado. Sed ĉu nia legantaro deziras ke ni neniam presigos poezion kaj interesajn rakontetojn? La plimulto da leteroj kiuj tage venas enhavas gratulojn pri la poemoj kaj rakontetoj.

Alia helpanto de tiu ĉi bonfaranta movado havas gravajn internaciajn rilatojn kun fremdaj firmoj, kaj proponis ke ĉiuj komercaj Esperantistoj skribu al sia fremda klientaro, antaŭmetante Esperanton, kiel taŭga helpanta lingvo, kaj petante ke ili lernus ĝin por estontaj komunikaĵoj. Bonega ideo! Se oni konsentos tiel fari, La Esperanto Klubo presigos anoncaperojn kaj disdonos ilin inter siaj komercaj membroj. La Hon. Sek. estos feliĉa ricevi specimenojn de la proponita anonco.

Ree dankante ĉiujn kunverkantojn, ni petegas pri originale verkitaĵojn artikolojn por la Gazeto. En ĉiuj landoj estas la sama afero. Oni trovas grandan nombron da skeptikuloj, kiuj diradas: "Ho! Mi vidas ke via lingvo estas bona nur por tradukaĵoj. Kiam vi havos vian propran verkaron, mi eklernos Esperanton. Sed, en la nuna tempo, mi pliamas mian patrujan lingvon."

Mi skribis tiun ĉi peton al nia bona amiko, Sinjoro Ben Elmy, kaj, kiel rezulto, niaj legantoj nun havas la grandan plezuron legi *Esperantan* poemeton, kun Angla traduko. Aliaj amikoj jam respondis al tiu ĉi peto kaj sendis la interesajn rakontetojn kiuj estas tie ĉi presitaj kaj koreĝe ĉiuj devas danki ilin por la granda helpo kiun ili donis al Esperanto, tielfarinte. Kvankam tradukoj estas tre akcepteblaj, originalaj verkoj sendube estas indaj je antaŭeco.

The same critic also opined that there was not enough English in the first number. It contains only sixteen pages, and the majority of readers desire to read Esperanto matter, not English. One of our painstaking collaborators has promised to mark all words not to be found in the Textbook, and we will always give their meanings. In this manner we hope to please those who wish to see more in English, without limiting the interesting matter.

Among the friends who have written of the great purpose of Esperanto, one has said "Xenophon led the lost Greeks through the barren eastern land of poetry, sand, and romance. And you, my friend-in-Esperanto, must—by means of your Gazette—guide the dreamy Esperantists down into the everyday land of pork and beans!"

Truly this is good counsel, for Esperanto must be a "Bread and butter language" for commerce and daily life. But do our readers wish us never to print poetry and interesting narratives? The majority of the letters which continue to arrive daily contain congratulations on the poems and short stories.

Another helper of this beneficent movement has weighty international relations with foreign firms, and has proposed that all commercial Esperantists should write to their foreign clients, submitting Esperanto as a suitable auxiliary language, and asking them to learn it for future communications. A most excellent idea! If this be approved, the Esperanto Club will have circulars printed and will distribute them among its commercial members. The Hon. Sec. will be glad to receive specimens of the proposed announcement.

Again thanking all collaborators, we appeal for original work for the Gazette. In every land it is the same. One finds a great number of people, sceptics, who continually say, "Oh! I see that your language is only good for translations. When you have your own literature I will take up the study of Esperanto. But, at present, I prefer my national tongue."

I wrote this request to our good friend, Mr. Ben Elmy, and, as a result, our readers now have the great pleasure of reading an *Esperanto* poem with English translation. Other friends have already responded to this appeal, and all must thank them most heartily for the great help they have given to Esperanto in so doing. Although translations are very acceptable, original works are, without doubt, worthy of precedence.

LA REDAKTORO.

<sup>1</sup> Lit. : "Potatoless."

*Literal translation.*

## KION MAX MÜLLER DIRIS.

## WHAT MAX MÜLLER SAID.

Mideziras scii ĉu THE ESPERANTIST estas preta por akcepti en ĝiaj kolonoj la liberan uzon de la ĉiam ĉeestanta persona pronomo "Mi." Eble mi, ĝin enkondukante, estas iomete maltima, sed mi ne povas eviti la opinion ke, eĉ nova lingvo devas enhavi almenaŭ kelkajn el la nekonvenaĵoj kiujn ĉiuj malnovaj lingvoj necese toleras.

Tio, kion mi tuj rakontos, nur estas malgranda persona memoraĵo, sed ĝi kunligas kun la nomo de fama lingvisto ; tre citinda aŭtoritato.

Mi estis en Venecio, ne staranta inter palaco kaj malliberejo, sed gondole glitanta sur la kanaloj de la feina urbo, tiel kiel ĉia mortemulo devas fari, se li deziras elpruvi ke vivo estas vivinda. Mi tiam estis leganta artikolon "Rememoraĵoj" de Max Müller, kaj ĝi tiel ĉarmis min ke, tuj post mia reveno hejme, mi skribis al li iom simile al jeno—

"Mi estas al vi nekonato. Se mi ne skribos tuj sub la puŝo de la impreso, mi tute ne kuraguŝ fari tion. Sed, kompreneble, ni devus koni unu la alian. Vi, baptifilo de Max Maria von Weber, mi baptifilo de Felix Mendelssohn! Vi lernis latinan kaj grekan lingvojn en Leipzig, mi ankaŭ lernis tie; sed vi studiiis ĉe la Nikolai-Schule kaj mi ĉe la Thomas-Schule; jen la malsameco de la rezultato klariĝas. Sed ni, kiel knaboj, ambaŭ devis manĝi niajn pomojn el la korbo de la sama maljunavendistino en Grimmaischer Strasse, k.t.p."

Nu, Max Müller respondis al mi tute afable. Li sciigis min ke li iam aŭdis mian patron ludi fortepianon kune kun Mendelssohn, ke li ankaŭ estis vidinta unu el miaj pentraĵoj tial ni ne estis nekonatoj. Ĉu mi venus Oxfordon post mia reveno en Anglujo, kaj ĉu mi volus esti lia gasto?

Post kelkaj monatoj mi do iris, kaj pasigis malmultajn tagojn en lia domo. Tiu ĉi estis senegala okazo por sciigi liajn opiniojn pri la alprenado de universala lingvo.

"Ĉu la afero estas ebla?" mi demandis. "Netatige kian lingvon oni elektos. Me bezonas vian aŭtoritaton por silentigi tiujn kiuj kredas ke la propono nur estas himera."

"Nu," li respondis, "vi devas demandi tion de pli junaj kritikistoj ol mi. Vi scias ke mi jam skribis mian kredon ke Esperanto estas la plej bona sistemo ĝis nun elpensita; mi ne povas diri plu." Mi petegis, eble iom supermezure, sed sensukcese.

I wonder whether the columns of THE ESPERANTIST are disposed freely to admit that ever-present personal pronoun, "I." I am perhaps bold in introducing it, but I cannot help thinking that a new language must have to put up with some of the inconveniences, at least, that all old languages have had to tolerate.

What I have to relate is but a little personal souvenir, but it is connected with the name of a great linguist, and an authority well worth quoting.

I was in Venice, not standing between a palace and a prison, but gliding along the canals of the fairy city in a gondola, as every mortal should if he desires to realise that life is worth living. I was reading an article, "Reminiscences," by Max Müller, which delighted me so that the first thing I did on returning home was to write to him, somewhat on these lines—

"I am a stranger to you, and if I don't write on the spur of the moment, I should not venture to do so at all. Yet surely we ought to know one another. You, a godson of Max Maria von Weber, and I a godson of Felix Mendelssohn! You learnt your Latin and Greek in Leipzig, and so did I; only you went to the Nicolai-Schule and I to the Thomas-Schule, which accounts for the difference in the result. But we must have eaten our schoolboy apples from the same old woman's basket in the Grimmaische Strasse, etc., etc."

Well, Max Müller answered in the kindest spirit. He had heard my father play with Mendelssohn, and he had seen a picture of mine, so we were not strangers. Would I come to Oxford on my return to England and be his guest.

Some months later I went, and spent several days at his house. There was a unique opportunity of fully ascertaining his views on the adoption of a universal language.

"Is such a thing possible?" I asked him. "Never mind which language is to be selected. I want your authority to silence those who look upon anything of the kind as chimerical."

"Well," he said, "you must go to younger people for an answer to that. You know that I have given it as my opinion that Esperanto is the best attempt at a universal language yet made, and that is as much as I can say." I pressed him, perhaps rather unduly, but without success.

Sed, kiam mi estis forironta el lia gastama domo, li redonis al mi albumeton (baptopatron donacon de Mendelssohn), en kiu mi petis ke li skribu sian nomon, kaj mi legis—"Ĉu universala lingvo estas ebla? Jes.—M.M."

But as I was leaving his hospitable house he handed me back a little album (a godfather's gift from Mendelssohn), in which I had asked him to inscribe his name, and I read—"Is a universal language possible? Yes.—M.M."

FELIX MOSCHELES.

Oxford, July 2, 10 p.m.

Is a universal language possible? Yes, M.M.

Felix Mendelssohn:

Wenn Menschen aus einander gehen  
So sagen sie, Auf Wiedersehen, — auf Wiedersehen.

Felix Moscheles:

Die Sprachen sind auch aus einander gegangen.  
Dram theiten sie alle dasselbe Verlangen  
Auf Wiedersehen, auf Wiedersehen!

F. Max Müller.

*Felix Mendelssohn* diris.—Se homoj disiĝas ili diras "Ĝis la Revido, Ĝis la Revido."

*Felix Moscheles* diris.—La lingvoj ankaŭ estas disiĝitaj, do ĉiuj partoprenas la saman deziron. "Ĝis la Revido, Ĝis la Revido!"

## L'ALMOZULINO.

### THE BEGGAR MAID (TENNYSON).

Ŝi, de beleco nedirebla  
La manojn sur la brusto tenis :  
L'Almozulino nudpieda  
Al reĝo Kofetuo venis.  
La reĝo, kun mantel' kaj krono,  
Renkonti ŝin malsupreniris  
"Nature, ŝi pli bela estas  
Ol lumo," ĉiuj Grafoj<sup>1</sup> diris.

Ŝi, en mizera vesto, ŝajnis  
Al ili, lum' tra nuboj hela ;  
Ŝin laŭdis ili, pro okuloj,  
Piedoj, haroj, mieno bela.  
Neniam estis en la lando  
Vizaĝ' aŭ ĉarm' anĝela tia,  
Kaj ĵuris Kofetuo "Estos  
L'Almozulin' regino mia."

C. BICKNELL.

<sup>1</sup> Counts ; barons.

[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 6266.]

(Vidu la komencon en Novembra Nro.).

## AKTO I.

## SCENO I. (daŭrigo).

(Revenas la SUBESTRO.)

SUBESTRO.—Faligu la grandmaston! vige! pli malepren! Penu direkti la ŝipon al la maro! (Ekkrioj interne) Malbenon al tiuj kriegoj! Ili bruegas pli laŭte ol la blovado, aŭ eĉ nia propra kriado! . . . (Revenas SEBASTIANO, ANTONIO kaj GONZALO) Ree? ankoraŭ? Kion vi faros tie ĉi? Ĉu ni devos ĉesigi nian penadon kaj droni? Ĉu vi deziras iri al la marfundo?

SEBASTIANO.—Ha peston al via faringo, kriemulo,<sup>2</sup> blasfemanta malbenita hundo!

SUBESTRO.—Nu, do, laboru vi mem!

ANTONIO.—Pendu, malbona hundo; pendu, filo de malvirtulino, insultema bruegulo! Ni ne tiel kiel vi timas droni.

GONZALO.—Ho! lin mi asekuras<sup>3</sup> kontraŭ la dronado, kvankam la ŝipo ne estus pli fortika ol nuksea ŝelo.

SUBESTRO.—Direktu la ŝipon! Du gradojn plie, al la maro . . . haltu!

(Venas MARISTOJ tute akvokovritaj.)

MARISTOJ.—Ĉio estas perdita! ni preĝu! ni preĝu! Ĉio perdita! (Foriras ĉiuj)

SUBESTRO.—Kion? Ĉu malvarmiĝos niaj buŝoj?

GONZALO.—La reĝo kaj la princoj ĉiuj preĝas: Samstate ni kun ili preĝi devas.

SEBASTIANO.—Mi perdas paciencon.

ANTONIO.—Ni pereos

Per la maldiligento de drinkuloj—  
(Al SUBESTRO) Largaŭka bruegulo mi tre volus

Vin vidi droni en dek maralfuuj<sup>4</sup>!

GONZALO.—Pendonta, tamen, li post ĉio restos, Ja, kvankam plendos ĉiu guto akva

Kaj large malfermiĝos por lin [gluti. . . .

(Ekbruoj interne) Ĉiel' kompatu! nun fendigas ŝipo!

Adiaŭ do, edzino kaj infanoj!

Ho ve,<sup>5</sup> adiaŭ, frato! Ĝi fendigas!

ANTONIO.—Ni ĉiuj nun fundiru kun la reĝo!

(Foriras).

SEBASTIANO.—Ni iru tuj al li adiaŭ diri! (Foriras).

GONZALO.—Nun, volonte, mi ŝanĝus mil majlojn da marakvo nur por seka terpeco, longa erikejo,<sup>6</sup> bruniginta dornstipejo,<sup>7</sup> io ajn! Estu do la superega Volo! Sed mi preferus seke morti.

(Foriras).

## SCENO 2.—Sur insulo—antaŭ la ĉambreto de PROSPERO.

(Venas PROSPERO kaj MIRANDO.)

MIRANDO.—Karega patro, se per via povo La maro tiel brue sovaĝiĝis, Ho trankviligu ĝin! Nun preskaŭ [ŝajnas Malbonodoran peĉon Ĉiel' vomis.<sup>8</sup> Se supraj ondoj ne estingos fajron . . .

. . . Suferis mi kun la malfeliĉuloj Videble kiuj dronis en la ŝipo! Kreitoj noblaj ili estis, eble, Kaj, jen! nun estas ĉiuj disrompitaj . . . Ĝemegoj ĝis la mia kor' [atingis!

Se ia dio estus mi potenca, En teron volus mi trapuŝi maron, Prefere ol engluti belan ŝipon Ŝargitan tute je animoj homaj! . . .

PROSPERO.—Ne plu miregu nun, kaj kvietiĝu; Al via kompatema koro diru: Ne malbonaj okazis.

MIRANDO.—Ho ve, patro!

PROSPERO.—Nenio, ja, filino, ĵus okazis Krom ĉio, kion mi efektivigis Por vi, filino mia, karulino! Vi kiu ido estas nescianta, Ĉar, nek vi scias pri l'elveno mia, Nek konas min pli altan ol Prosperon, La mastron de malriĉa tia loko, Kaj simplan patron vian.

MIRANDO.—Mi neniam

Imagis plie.

PROSPERO.—Estas nun la tempo,

Kaj vin mi devas plie tuj informi.

—Forprenu la magian<sup>9</sup> veston mian—

(Demetas la mantelon).

Magio restu. Plu ne ploru, kara;

Konsolu vin. Terura la vidaĵo

De ŝippereo, kiun vi bedaŭras,

Okazis tiel, per magia povo,

Ke iu, kiu estis en la ŝipo

Nek mortis, nek eĉ haron tie perdis,

—Kriegojn kvankamaŭdis vi, kaj vidis

Fundiri ŝipon—Sidu, nun, Mirando,

Ĉar vi plimulte devas tuj sciigi.

(Daŭrigota).

<sup>1</sup> Cheerily, actively.    <sup>2</sup> Noise-maker, brawler.    <sup>3</sup> Insure.    <sup>4</sup> Tides.    <sup>5</sup> Alas!    <sup>6</sup> Heath.    <sup>7</sup> Prickly broom (or furze) patch.    <sup>8</sup> Vomit.    <sup>9</sup> Magic.

## LEKANTETO AUTUNA.

“Purpurvestata kara aŭtuna flor’,  
Vi ploras, do, pri morto de l’somero ?  
Funebra, certe, estas la kolor’,  
Kaj ĉiam servas al la malespero !”

“Ha, ne ! Vi ne forgesu, kara mia,  
Purpuro apertenas al majesto ;  
Kaj plaĉas al la vintroreĝo nia,  
Ke prezentigu mi en deca vesto !”

12a Okt., 1903.

BEN ELMY.

## THE MICHAELMAS DAISY.

“Dear little Autumn flower, with purple clad,  
Dost thou thus weep the death of Summer fair ?  
Funereal, truly, is thy colour sad,  
And ever serves as symbol of despair !”

“Ah, no ! dear friend, remember yet one thing—  
That purple, too, is Majesty’s display ;  
And ’t is the pleasure of our Winter king,  
That I present myself in meet array !”

Tradukis BEN ELMY.

## MORDANTO MORDITA (Originale Verkita).

Tiu ĉi okazis dum mia lernado ĉe la universitato. Bruno estis unu el miaj plej intimaj amikoj kaj ni ofte renkontis nin kun aliaj samideanoj ĉe la loĝejo de unu aŭ alia por amika kartoludeto. En tiu ĉi okazo la renkontejo estis ĉe Bruno.

Blanko, alia amiko, alvenis kun mi je la dirita horo, sed tie troviĝis neniu. “Pendu” ni diris. Ni atendis longan tempon : Bruno ne venis. Ni do ekkoleriĝis, kaj deziris repagi al Bruno pro tiu ĉi malplezuro. “Kion ni faros ?” “Malsaĝkaptilon !”<sup>1</sup> “Bonege !”

Ni formovis la tablon en angulon de la ĉambro. Sur la tablo, per la helpo de kapkuseno<sup>2</sup> el la dormoĉambro, de kelkaj vestoj, kaj de la lamposfero<sup>3</sup> sur kiu ni figuris malbelegan vizaĝon, kaj en kiu ni enmetis kandeleton, ni konstruis terurigan kreitaĵon. Tiam ni atendis.

Baldaŭ ni aŭdis la paŝojn de la alproksimiĝanta Bruno, kaj ni retiris en la dormoĉambron. La pordo de la ĉambro malfermiĝis : Bruno eniris.

Subite terurplena kriego surdiĝis niajn orelojn. Nia mizera amiko enfalis prezkaŭ senmove en sian seĝegon, nur murmurante—“Mi ĝin vidis ! Mi ĝin vidis ! Mi estas viro mortonta !”

Tiu ĉi rezultato surprizis nin. Ni neniam deziris kaŭzi tian malfeliĉecon.

Kredante ke nia amiko nur ridegis, mi ekkriis “Brandon ! Rapide, rapide, alportu la brandon !” Estis senutile. La glaso ekfalinte el la mano de la suferanto, rompiĝis sur la tapiŝo. Tre malrapide, el la disigitaj vortoj de la malsanulo, ni eliris la sciigon ke li kredis vidi la aperaĵon kiu ĉiam montras sin al membro de la familio Bruno, antaŭ la subita morto de tiu persono.

Ni penis klarigi la aferon, sed sensukcese.

Mi do eliris por venigi kuraciston.

Loĝante en la koleĝo, estis necese ke mi petu permeson de la koleĝestro, ĉar vespere je dirita horo la pordego fermiĝis por ke neniu povu senpermeso eliri. La koleĝestro, maljuna sinjoro,

bonvolega al la junuloj kiuj venis sub lia flego, kvankam gravmaniera kaj solenvizaĝa, aŭskultinte mian klarigon, tuj donis al mi la deziratan permeson, samtempe dirante—“Estas granda malfeliĉeco, granda, grandega ! Mi kredas ke mi mem iros por lerni ĉu mi povos ion fari.”

Ĉar la koleĝestro tre malofte vizitis la loĝejon de koleĝanoj, tiu ĉi propono estis tiel ne atendita ke mi tute forgesis la kuraciston, kaj sekvis la estron al la loĝejo de Bruno.

Enirante en la ĉambron ni trovis Brunon ankoraŭ flegatan de Blanko, ŝajne neniel plibonigitan. La vizitanto neatendita, klinante sin super la junulo diris amindavoce—“Mia kara Bruno, mi tre bedaŭras aŭ. . . .”

Kvazaŭ elektrigita, la trompplena Bruno eksaltis sur siajn piedojn elkriante per la plej sana voĉo—“Pardonu al mi, Sinjoro, tute senintence mi petolis<sup>4</sup> antaŭ vi.”

Unue iom enuata, sed baldaŭ komprenante la ŝercon, nia bona estro trankvile diris—“H—m ! Belega ekzemplo de ‘Mordanto mordita’ Bonan Nokton, Sinjoroj, bonan nokton.”

Tiel parolinte li ridetante foriris.

Booby-trap. <sup>2</sup> Pillow. <sup>3</sup> Lamp globe. <sup>4</sup> Played the fool.

PAUL MATHEWS, *Esperantisto* 7799.

*Almozulo* : Donu al mi pencon, Sinjorino !

*Sinjorino* : Ĉu vi ne povas trovi laboradon ?

*Almozulo* : Ne, mia metio estas senutila al la nuna tempo.

*Sinjorino* : Kial ? Kion vi faras ?

*Almozulo* : Mi forŝovelas neĝon de pavimo.

G.C.L.

## LA TRI AMIKOJ.

Konfidu je nenia amiko ni pruvinte lin. Ĉe la festena tablo ni trovas pli multajn ol ĉe la pordo de la malliberejo.<sup>1</sup>

Homo havas tri amikojn; du el ili li multege amis, la tria estis al li indiferenta, kvankam tiu ĉi estis la plej sincera el ĉiuj. En tago li devis aperi antaŭ la juĝisto ĉar li estis grave sed maljuste kulpigita. "Kiu el vi," li diris, "venos kun mi por atesti por mi, ĉar mi estas grave kulpigita kaj la reĝo koleriĝis?" La unua el liaj amikoj tuj diris ke, pro aliaj aferoj, li ne povus iri kun li. La dua akompanis lin ĝis la pordo de la juĝejo, tiam li iris returnen pro timo de la kolera juĝisto.

Sed la tria, al kiu li malplej konfidis, eniris, paroladis por li kaj atestis tiel ĝoje pri lia senkulpo, ke la juĝisto liberigis lin.

Homo posedas tri amikojn en tiu ĉi mondo. Kiel li kondutos je la horo de la morto, kiam Dio vokos lin antaŭ sian juĝejon? Mono, lia plej bona amiko, forlasos lin unue. Liaj parencoj akompanos lin ĝis la pordo de la tombo, kaj tiam returnos domen. La tria, kiun li ofte forgesis dum la vivo estas liaj Bonagoj. Nur tiuj ĉi akompanos lin ĝis la trono de la Juĝisto. Ili antaŭiros, parolos, kaj trovos por li kompaton kaj pardonon.

ELISE BAUER.

<sup>1</sup> Prison.

## LEGENDO PRI LA VIRO EN LA LUNO.

Antaŭ multe da jaroj je Dimanĉo, viro iris en arbaron por kolekti lignon. Li kunigis ĝin, kaj, portis ĝin domen. Li renkontis belan viron, dimanĉe vestitan, kiu estis ironta al preĝejo. Li haltis, ekparolis al la lignoportanto kaj diris "Ĉu vi scias ke sur la tero hodiaŭ estas Dimanĉo, kiam Dio ripozis, kreinte la mondon, ĉiujn bestojn kaj la homaron? Ĉu vi ne scias ke estas skribite en la tria komando Sanktigu la Dimanĉon?"

Sed la viro estis korhardigita kaj respondis "Dimanĉo tera aŭ Lundo ĉiela, kion faras tio al mi?" La bela viro, kiu estis Dio mem, respondis "Portu do eterne vian branĉaron. Kaj tial ke Dimanĉo sur la tero ŝajnas al vi esti senvalora, havu do eternan Lunon en la Luno kaj staru ĉiam tie kiel timiginta ekzemplo por ĉiuj kiuj malsanktigas la Dimanĉon per laboro." De tiu tempo la viro kun la branĉaro staras en la Luno, kaj eble starados tie eterne.

ELISE BAUER.

## PRAKTIKA UZO DE ESPERANTO.

Antaŭ iaj semajnoj aperis artikolo en la *Daily Mail* kie oni skribis ke Japananoj trovis ke, se ili manĝadis nur rizon, ĝi produktis hidropsion, sed se ili miksis hordeon kun la rizo la malsano ne okazis.

Trovante en la Adresaro la nomon de Japonano, mi tuj skribis al li sciigante lin pri la supre nomita artikolo kaj demandante ĉu ĝi estis akurata.

Mi ricevis la sekvantan respondon—"La malsano okaza estas ne la hidropsio sed beriberi aŭ elofantiasio. La rizo sole ne kaŭzas tion: La malriĉuloj, la kampanoj, ankaŭ suferas je tiu malsano kvankam ili ne ofte manĝas rizon; eble nur unu aŭ du foje dum monato. La rimedo por tiu malsano estas ne ankoraŭ konata, sed la mikso de hordeo kun la rizo estas bona; ankaŭ la aero de la patralando. La homoj kiuj vivas en malaerigata ĉambro havas ofte tiun malsanon. Unu aŭ du monatoj en la patralando estas sufiĉaj por kuraci ĝin." (Espo. 7383).

ESPERANTISTO 8105.

Kara Sinjoro, La unua numero de via tre laŭdinda gazeto ne sole donis al mi grandan plezuron sed ankaŭ portis benon al ĉiuj de tiu ĉi loko; ĉar, ĵus ĉe la momento de ĝia alveno, komencis la pluvo de ni longatempе dezirita, kaj kiam mi malfermis la koverton, brilaj fulmoj kune kun la lumo de mia elektra lampo lumigis al ĝiaj bone presitaj paĝoj. Certe ĉiuj Anglaj Esperantistoj dankos vin tre kore por via kuraĝa kaj sindonema laboro, kaj deziros longan vivon kaj plenan sukceson al la entrepreno. Mi bedaŭras ke mi mem donis malbonan ekzemplon al miaj pli junaj Esperantuloj, skribante en mia artikoleto "Itala Somero," ke oni kulturis ĉe ni *Kariofilojn*.<sup>1</sup> Mi devis esti skribinta *diantojn*,<sup>2</sup> ĉar la kariofilo,<sup>1</sup> kreskaĵo de tropikaj landoj, ne povas vegeti tie ĉi. Kvankam mi estas nemetiista<sup>3</sup> botanikisto, mi ne sciis la sciencon namon por "cloves," kaj mi ne lernis la Esperantan vorton por "carnation."

Jen mia konfeso kaj senkulpigo! Nun mi almenaŭ ellernis tre multe pri la kariofila<sup>1</sup> naturscienco, uzado, kaj mi miriĝas legante ke Anglujo enportas ĉiujare  $\frac{1}{4}$  milion funtojn<sup>4</sup> da tiu drogo Certe ĉiuj ne estas uzitaj por bongastigi niajn pomtortojn!<sup>5</sup>

Kun sinceraj gratuloj,

Via fidele,

C. BICKNELL.

<sup>1</sup> Cloves. <sup>2</sup> Carnations. <sup>3</sup> Amateur. <sup>4</sup> Pounds.  
<sup>5</sup> Apple tarts.

# LA SONO DE VOĈO.

(Telefona Okazo.)

(de G. S. WEBSTER, eltirita el "TAT," tradukita de JOHN ELLIS.)

S-INO JUNEDZO.

S-O JUNEDZO.

VOĈO.

[SCENO.—*Manĝoĉambro ĉe Gesinjoroj Junedzo. La telefono estas fiksita sur skribtablo.*]

S-INO JUNEDZO (*alparolante al katido, dume ŝi ĉirkaŭligas banton<sup>1</sup> ĉirkaŭ ĝia kolo<sup>2</sup>*).—Nu<sup>3</sup>, katideto, mi miras kion mia Riĉjo faras. Mi esperas ke li ne aliris al malplaĉega ĉevalkura konkurso—mi ne kredas ke li sin okupas tiamaniere dum lia libera tempo—malgraŭ la duonesprimajoj<sup>4</sup> de Klara Paseo, sed—. Bone, mi jam alvokis lin telefone nur sepfoje hodiaŭ, kaj li mem respondis al mi ĉiufoje; tial ĉio necese estas tute ĝusta. (*Sidigas la katidon sur kuseno*) Nu, kion fari? Estas tro varme por eliri kaj vizitadi. Mi jam parolis kun la servistinoj pri iliaj kulpetoj, sufiĉe je unu tago. Mi kudris butonon sur la ganto de Riĉjo, kaj mi jam skribis dudek-sep paĝojn al la patrineto. Ho! Mi devas alvoki Riĉjon denove; li kutimas aŭdi mian voĉon almenaŭ okfoje en ĉiu tago. Kara knabo! Li pensos ke mi ĉesis ami lin, aŭ ian similan teruraĵon! (*Aliras al la telefono kaj sonorigas*) "N-on 2,337 Junedzo, mi petas." (*Post momento, ŝi aŭdas respondon.*)

S-INO J. (*en 'fonon*).—Jes, ĉu vi ĉe-estas?

Voĉo.—Kompreneble, Karulineto!

S-INO J.—Kiu estas tie?

Voĉo.—Kies voĉo sonas, ĉu vi pensas?

S-INO J.—Tio estas simila je la voĉo de mia propra edzeto.

Voĉo.—Tia mi estas, Kara Mia!—Via vera, sola, propra Riĉjo.

S-INO J.—Ĉu vi maltrankviliĝas kaj pensadas ke mi ne estas alvokonta al vi denove, Plejkara?

Voĉo.—Jes; mi ja terure maltrankviliĝis pri tio, Koro Mia.

S-INO J.—Kion vi faras?

Voĉo.—Mi tre laboradas, kaj multe pripensadas pri mia propra edzineto. (*En tiu-ĉi momento, persono larĝaŝultra, festatempе vestita, mallarĝe malfermas la pordon. Li staras senmove, kaj rigardas S-in'n J., ridete sed silente.*)

S-INO J. (*en 'fonon*).—Mi sentadis tre forlasite la tutan tagon longe.

Voĉo.—Kompatinda knabineto! Baldaŭ mi revenos, ĉarmanta mia.

S-INO J.—Mi skribis dudek-sep paĝojn al la patrineto.

Voĉo.—Ĉu efektive? La kara maljuna sinjorino! Mi esperas ke vi sendis al ŝi la esprimon de mia amo.

S-INO J.—Ha! Nu, mi ŝatas<sup>5</sup> aŭskulti vin kiam vi parolas tiel pri la patrineto. Penu ĉiam paroli tiamaniere pri ŝi kiam vi estas hejme. (*La persono apud la pordo ŝajnas malkontente, kaj ial iom ekscitate.*)

Voĉo.—Mi promesas, Amatino Mia.

S-INO J.—Mi ja pensas ke vi povus aranĝi ke vi venos hejmen frue hodiaŭ, Riĉjo, por festi la trian monaton de nia edzeco. (*La persono subite timiĝas, kaj provas forŝteli mallarĝe for de la ĉambro, senvidite.*)

Voĉo.—Tion mi volus, karulineto mia; sed ni estis tre okupataj ĉe la oficejo la tutan tagon longe, kaj . . . (*la persono piedŝtrapas senintence la katidon—la katido blekas . . . kaj S-INO J. ĉirkaŭrigardas antaŭe ol la persono povas atingi la pordon—ŝi lasas fali la aŭdilon telefonan, rapidas al li, kaj kaptas lin sovaĝe per lia brako.*)

S-INO J. (*kun milo<sup>6</sup> da vulkanoj<sup>7</sup> je sia voĉo*)—**RIĈJO!! RIĈARDO!!!**

S-O J. (*provas gajete ŝajni kuraĝa*).—Nu, Kara Mia, ĉu vi ĝojas min revidi?

S-INO J. (*trenas lin al la telefono*).—Venu tien-ĉi. (*Ŝi tenas la aŭdilon sur lian oreilon, kaj tuj poste parolas en la telefonon si mem.*)

S-INO J. (*en la 'fonon*).—Kaj kiu vi diris ke vi estas?

Voĉo.—Efektive, ĉu vi forgesis tiel baldaŭ? Via propra Riĉjo.

S-O J.—Sed, pendigu! . . . (*S-INO J. metas sian manon sur lian buŝon.*)

S-INO J.—Kaj kion vi diris ke vi faris?

Voĉo (*ripetas malrapide kaj tre klare*).—Ke mi tre laboradis, kaj multe pripensadis pri mia propra edzineto.

S-O J. (*li mem provanta alvoki per la telefono*).—Silentiĝu, malsaĝulo! Ĉu vi ne scias. . . . (*S-INO J. ĉesigas lin kiel antaŭe.*)

S-INO J. (*en la 'fonon*).—Ni finigos tiun-ĉi konversacion ĉar S-o Junedzo, kiu estas apud mi, laĉigas iom aŭskultante lian propran imaaĝan voĉon. Bonan tagon! kompleze tenu vin pretige por atesti kiam mi procesos por ricevi juĝan disigon.<sup>8</sup>

Voĉo.—Ŭ — ŭ — ho! ŭ — ŭ — (*S-INO J. sonorigas por ĉesigi la elektran komunikadon; sin turnas al S-o J., kies vizaĝo grade iĝas fraga-tomata-sun-malleviĝan specon de koloro.*)

S-INO J. (*per nordpolusa<sup>9</sup> voĉo*).—Havu la bonecon klarigi—se eble vi povas.



S-O J. (*gajete*).—Certe, kara mia, certe! Nu, vi vidas, karesinda mia, vi havas tre dolĉan kutimetan, alvokante min ĉe la oficejo ĉiuhore, kaj ĉar mi—  
 ŭ—ne estas—ŭ—ĉiam tie. . . .

S-INO J.—Estante ĉe ĉevalkuraj konkursaĵoj, eble?

S-O J. (*kuraĝejo*).—Jes, estante ĉe ĉevalkuraj konkursoj; kvankam, trovinte mian unuan gradan bonprosperajn hieraŭ, mi estas forlasonta tiojn de nun. Sed, daŭrigante . . . ĉar mi ne ĉiam estas ĉe la oficejo, mi pensis ke vi koler. . . ŭ . . . maltrankviliĝus se mi ne respondus ĉiufoje kiam vi sonorigus por mi; tial mi ordonis ke Korkisto, mia ĉefkomizo, kiu estas iom da ventroparolanto, imitu mian voĉon, kaj respondu al vi tiam, kiam mi forestus, kaj la malsaĝulo nesciis ke mi jam venis hejmen frue hodiaŭ—tial—Ho! pardonu min, Mimio!

S-INO J. (*frostato*).—Neniam! (*surlevigante la katidon*) Venu kun mi, katideto, ni ambaŭ estas trompigataj. Ne pensu ni plu pri tio! Ni reiros al la patrineto, kaj . . . (*lasas larmon fali sur la dorson de la katido*). Sed (*sin turnante al S-O J.*) permesu al mi por diri al vi, Sinjoro ke—(*telefona sonorileto tintus*) Ha! la fono denove! (S-O J. *saltas antaŭen kvazaŭ li volis respondi*—S-INO J. *malhelpas lin*) Pardonu min, nun estas mia

vico for falsi la telefonon, mi kredas. Eble estus eĉ pli interesa afero, se mi provus ventroparolan aktoraĵon (*aliras al la telefono kaj respondas per raŭka, vira voĉo*) jes, kiu estas tie?

Voĉo.—Ho! Maljunulo! Ĉu tiu estas vi?

S-INO J. (*sams kiel antaŭe*).—Ne,—Ŭ—tio estas, jes.

Voĉo.—Nu, nur unu vorto pri tiu diamanta ĉirkaŭkolo, kiun vi petis ke mi elektu por via edzino. Vi diris ke via vetgajno estis cent-deko da libroj; nu, ĉar vi volas aldoni plue dekon, mi povas ricevi ĵus tion, kion vi bezonas, pendaĵon ankaŭ, po cent-dudek libroj. Ĉu tio vin ŝatas?

S-INO J. (*per malforta voĉeto*).—Riĉjo, ĉu vi volus veni kaj respondi al tiu-ĉi, mi petas?

(*Li aliras al la telefono, kaj post aranĝinte la aferon, sonorigas por ĉesigi la komunikadon, kaj sin turnas al S-ino J., kiu sidas sur la sofo, ŝia vizaĝo en la pelto de la katido, kaj ploras iom*).

S-O J. (*alstreĉante liajn brakojn*).—Mimio!

S-INO J. (*lasas fali la katidon*).—Ho! Ho! (*Sur lian bruston*) Ho! Riĉjo!! (*La katido ĝoje murmuris*).

<sup>1</sup> A knot of ribbon. <sup>2</sup> Neck. <sup>3</sup> Well! <sup>4</sup> Half statement.

<sup>5</sup> Like. <sup>6</sup> A thousand. <sup>7</sup> Volcanoes. <sup>8</sup> Separation. <sup>9</sup> Northpolar.

### PHONETIC LONGHAND.

In fulfilment of a promise made in the first number of THE ESPERANTIST, a few phrases are here given, with their equivalent English phonetic spelling. In reply to those friends who wish to see a monthly list of stock phrases, with their English meaning, we beg to remind them that the *Frazlibro de la Turisto* contains 400 such phrases, each in 6 languages, for the trifling cost of 6d. We are not disposed to sacrifice our limited space as suggested, unless, after mastering the 400 phrases named, which deal with a great diversity of subjects, our friends still feel the need for a further collection.

The phrases used below are culled from a forthcoming work by Mr. J. A. Thill, of Plymouth:—

Ĉiam uzu Esperanton kiam vi skribos

Ĉee | ahm ooz | oo Ayp | ayr | ahnt | ohn kee | ahm vee skreeb | ohs al mi.  
 ahl mee.

Veku min morgaŭ ĉirkaŭ la kvina horo.

Vav | koo meen mohrg | ow cheerk | ow lah kveen | ah hohr | oh.

Senvestigu vin kaj kuŝigu.

Sayn | vayst | eeg | oo veen ky koo:sh | eej | oo.

Mi prosperis en tiu ĉi afero.

Mee prob | spayr | sees ayn tee | oo chee ah | fayr | oh.

Mi devas refari tiun ĉi kalkulon.

Mee dayv | ahs ray | fahr | ee tee | oon chee kabl | kool | ohn.

Vi rejunigas pli kaj pli!

Vee ray | yoon | eej | ahs plee ky plee!

Kiam vi senvestigos viajn piedojn?

Kee | ahm vee sayn | vayst | eeg | ohs vee | ine pee | ayd | oyn?

### EN VAGONARO, REVENANTE DE LA MARO.

Lernejestro, afable parolante al la plej mallertulo de la lernejo:

Ĉu la maro alvenis al viaj atendoj, Roberto?

Lernanto, kiu estis tro proksimiĝinta al la undoj:

Se plaĉas, Sinjoro, ĝi alvenis al tie ĉi; Kaj, per fingro, li montris sian bruston.

E.M.

\* \* \*

Du fratinoj loĝis kune kun sia onklino, bona sed tre severa virino.

Unu tagon la plej maljuna ekvidis ke la infanino fosas en la ĝardeno kaj enterigas ion. Poste ŝi foriris por trovi tion kion sia fratino faris: Kaj ŝi eltiris el la truo paperan folieton sur kiu estis malbone skribitaj tiuj ĉi vortoj. "Kara Diablo, venu tuj kaj forportu mian onklinon Marion."

ESPERANTISTO, 4686.

\* \* \*

Du vendistoj de malnovaj vestoj loĝis kontraŭe. Nature ili ne tro amis unu la alian. Nokte anĝelo venis al unu el ili kaj diris. "Rakontu al mi tion, kion vi deziras, kaj mi donos ĝin al vi kondice ke via najbaro ricevos la duoblon da ĝi."

La viro pensadis longatempem kaj fine respondis "Mi volas ke mi blindiĝos je unu el miaj okuloj."

ESPERANTISTO, 8105.

## ALILANDAJ KUNBATALANTOJ.

Doktoro Zamenhof aminde skribis al ni la sekvantan leteron—

“Kara Sinjoro, Kun granda plezuro mi ricevis la unuan numeron de *The Esperantist*. La bona enhavo kaj la bela eksterajo faras tre bonan impreson. Mi estas tute certa ke la gazeto tre plaĉos al ĉiuj esperantistoj jam ekzistantaj, kaj ĝi baldaŭ fariĝos potenca kreilo de multaj esperantistoj novaj. La komenco eble estos malfacila, sed la fruktoj de Via laborado estos riĉaj kaj belaj. Volu enskribi min en la nomaron de la abonantoj  
Via, L. Zamenhof.”

Vere estas afablege de nia kara estro apogi la verkon de eklernantaro, kiel estas preskaŭ ĉiuj el niaj kunverkantoj. Estas granda honoro havi lin inter niaj abonantoj, kaj la Redaktoro estas certa ke la legantaro aprobas ke Doktoro Zamenhof estus la sola honorinda abonanto al la novenaskita organo.

\* \* \*

Sinjoro Fruictier skribis al ni el Parizo. “Tie ĉi nenio nova. Tridekses publikaj kursoj de Esperanto estas tuj malfermigontaj en Parizo: se nur ĉiu havus kvindek lernantojn diligentajn, estus bonege!!! Duan eldonon de *La Frazlibro* mi pretigas: al ĝi mi aldonas gramatikon plenan de Esperanto, en la kvin lingvoj. Kore via, P.F.”

Vero la lingvo rapidege antaŭmarsiadas en Parizo, kaj estas esperinde ke ankaŭ tie ĉi Londone ni baldaŭ havos 36 kursojn. *La Frazlibro de la Turisto* sen gramatiko certe estis bonega libreto; kiam oni aldonis kvinlingvan gramatikon, estos pli ol bonega, ĝi estos mirinde utila verketo.

\* \* \*

Sinjoro Bourlet, Prezidanto de la Grupo Esperantista Pariza skribis—

“La firmo Hachette & Ko. en Parizo preparas kun la helpo de Sinjoro de Ménéil tutmondan jarlibron Esperantistan. Tiu jarlibro enhavos la nomojn kaj adresojn de ĉiuj Esperantistoj proesperantaj Societoj, ĵurnaloj, k.c. Ĝi eliros en la monato Marto de la proksima jaro. Mi treege petas vin ke vi bonvolu sendi ĉiujn eblajn sciigojn, kiuj povus faciligi ĝian verkadon al Sinjoro B. F. de Menil, 46 Boulevard Magenta, Paris 10.

Internacian kaj kunfratan saluton.”

Le enskribo estas senpaga.

Sinjoro Cart skribis afablan leteron gratulante nin pri *The Esperantist* kaj petante ke ni enpresu nomaron de la libroj por la blinduloj. Plezuro ni anoncas ke la Angla lernolibro en la Brailla skribo nun estas eldonita, kaj ke ĝia kosto estas 4s. Ni ankaŭ sciigos ĉiujn blindajn amikojn de la nomaro de aliaj jam eldonitaj verkoj, se ili skribos al ni.

\* \* \*

Esperanto tre rapide antaŭiradas inter niaj Maltaj kunverkantoj. Dankoj al la sindonema propagando de Sinjoroj Agius kaj de Bono, preskaŭ ĉiuj la Universitatoj jam eklernas la helpantan lingvon. Eble la malgranda insulo baldaŭ fariĝos “*Esperantujo*,” kiu scias!

Sinjoro Agius skribis bonegan leteron kiu estis presita en la *Daily Malta Chronicle*, kaj ni skribis duan leteron pri Esperanto kiu ankaŭ estis tie presita.

\* \* \*

Du samideanoj en Ĵaponujo, Sinjoroj Gauntlett kaj Doorn, ankaŭ skribis pri Esperanto en la *Japan Times*. Ni ankaŭ sendis respondon.

Pest la ricevo de la dua letero, la Redaktoro de tiu ĉi malproksimega organo skribis kiel sekvas.— “The fact that our playful rap at Esperanto should have inspired a disciple of that up-to-date language in this far corner of the world to champion its cause is certainly almost sufficient to make us reconsider our former verdict (which was perhaps dictated by æsthetic rather than utilitarian motives), and to admit that Esperanto may after all have a brighter future than Volapuk. At least the acquisition of the new tongue can do no harm and may possibly do some good. We thank our correspondent for the trouble he has taken.— Ed., J.T.”

Bone, bonega! kaj la tutmonda Esperantistaro devas gratuli Sinjoroj Gauntlett kaj Doorn por la granda helpo kiun ili tiel donis al la lingvo ne en Ĵaponujo sole, sed ĉie.

\* \* \*

Ni bedaŭras ke ni ne povas presi ĉiujn la afablajn leterojn kiujn alilandaj amikoj sendis. Eble, en la estonteco, kiam nia malgranda organo estas bone loĝigita, ni povos pligrandiĝi ĝin kaj presi du paĝojn de alilanda korespondado. Ĝis tiu tempo venos, ni devas esti kontentaj kun nur unu paĝo de tiaj interesaĵoj.

## DU FABLETOJ.

*La Leono, la Urso kaj la Vulpo.*—Leono kaj urso iam trovis mortigitan cervidon, kaj longe interbatalis por posedi ĝin. Tiel grava fariĝis la batigo ke fine ambaŭ el ili, duone blindigitaj kaj duone mortigitaj, kuŝis sur la kampo, sen sufiĉa forto por tuŝi la trovaĵon streĉitaŭ inter ili.

Vulpo alvenante tiam kaj vidante ilian mizeran staton, trapaŝis inter ilin kaj forportis ia kaptaĵon.

“Kiaj malsagaĵaj kreitaĵoj ni estas,” ili ambaŭ ekkriis, “ni malsparis nian tutan forton kaj batis unu la alian nur por doni manĝon al fripono.”

*Batalantoj ofte perdas tion por kio ili interbatalis.*

(6266).

*La Hundo kaj la Katino*—Maljuna sinjorino posedis hundon kaj katinon. La hundo, kiun ŝi havis por gardi ŝian dometon, loĝis ekstere en ligna hundejo; kaj manĝis komunajn manĝaĵojn.

La katino estis karesita; kaj pasigis la tutan tagon manĝante luksaĵojn kaj dormante sur la mola tapiŝeto antaŭ la fajro.

Longatempe la hundo envie regardis la katinon; kaj fine parolis al ŝi kiel sekvas—

“Mi gratulas vin, fraŭlino, pri via tre bela vivo.”

“Kiel ĝi estas pli bona ol via?” respondis la katino, malfermante larĝe siajn okulojn.

“Ni ŝanĝu lokojn dum unu semajno; kaj eble vi eltrovos.” “Plezure,” respondis ŝi, kaj tuj la ŝanĝo estis farita.

Je la komenco la hundo ĝuis<sup>1</sup> sin en la saloneto, sed sia ĝojo ne estis longedaŭranta. Sia granda korpo okupis tro multe da spaco; kaj la servistino, kiam ŝi aranĝis la ĉambron, metis siajn piedojn sur lia kapo aŭ sur lia vosto, kaŭzante al li grandan doloron. La manĝaĵoj kiuj estis estintaj sufiĉaj por la katino, ŝajnis esti nenio al lia forta stomako, kaj li sentis kvazaŭ mortonta de malsato. Fine la saloneto, unue tiel varma kaj bela, fariĝis al li senaeran malliberejon. Post du tagoj li ne povis toleri ĝin pli longe, kaj, humile foririnte al la hundejo, diris “Ĉu vi estas tie, fraŭlino?”

“Jes,” respondis la katino je la pajlo interne.

“Nu, mi ĵus estis pensanta ke, se rabisto venus, vi ne povus kontraŭstari lin; tial mi revenis al mia propra loko.” La katino reiris en la saloneton ridetante.

*Ne avidu la sorton de via najbaro.*

(8380).

<sup>1</sup> Enjoyed.

## L'ANGELO KAJ LA INFANO.

## ELEGIO.

Angelo vizaĝe radia  
Kliniĝis ĉe l'flank de lulil<sup>1</sup>  
En kiu, spegule, je lia,  
Ripozis imago simil'.

“Infan', mia ĉarma similo,”  
Li diris, “ho! venu kun mi;  
Ni vivos en brila Ĉielo  
Ne estas Ter' inda je vi.

“Ĉar tie neniu ĝojegas;  
Suforas l'anim' en plezur'  
Ekkrio feliĉa elvokas  
Sopiron el kor sammezur'.

“Kaj timo kun ĉiuj festenas—  
Neniam trankvila maten'  
Vesperon similan entenas<sup>2</sup>  
Aŭ de l'morgaŭ estas subten<sup>3</sup>.”

“Ĉagreno kaj kora doloro  
Ĉu sulkus<sup>4</sup> vin, ho! frunto pur?  
Okulojn plenigus la ploro . . .  
Ĉu ja estas penseble nur?

“Ne, Ne, tra la supra vasteco  
Ekflugu tuj kune kun mi;  
Pardonas la Dia Zorgeco  
La tagojn estontajn por vi!

“Vestiĝn funebre neniu  
Por vin el ter' vidi forir';  
Last' hor' via estu por ĉiu  
Simila je l'ĉitienir'.<sup>5</sup>

“Nenia plorama vizaĝo,  
Ĉe l'tombo neniu ĝemant';  
Pro via benita pur' aĝo,  
Mortint' ŝajnas kiel dormant'.”

Flugilojn L'Angelo malfaldis,  
Kaj tra l'blua regno de l'sun',  
Duop' ili supren flugadis—  
—Senfila patrin' estas nun'.

El J. REBOUL.

Esperantigis A. MOTTEAU.

<sup>1</sup> Cradle.<sup>2</sup> Contains.<sup>3</sup> Support.<sup>4</sup> Wrinkle.<sup>5</sup> Coming here.

## CORRESPONDENCE NOTES.

In our first issue the hope was expressed that all Esperantists would, without delay, translate the two letters enclosed in the Textbook and send them in for "The Adresaro." Many have already done so, and will no doubt soon commence their foreign correspondence, even if the collecting of picture postcards or postage stamps be the initial incentive. Several translators have experienced slight difficulties in their work, which we now take the opportunity of explaining.

In the first edition of the Textbook the first letter contained the word "propono." Many were unable to translate this, the meaning of which is "proposal." "Ekskolonelo" also presented difficulty to many. The meaning is simply "ex-colonel"!

The more recent letters seem to contain but one point of difficulty—the wonderful ever-recurring word "samideano" (which was here put in the feminine through an oversight). We have not yet discovered an apt translation for this most useful term. One of our members has put "friend in Esperanto," whereas others describe it as "kindred spirit" or "fellow-thinker." The literal meaning is of course "one who shares the same idea as yourself."

A most interesting letter has come to hand from one of our enthusiastic members. We here print it at length:—

"DEAR SIR,—I am reluctant to encroach upon your time, but I feel I *must* write to congratulate you upon the get-up, the good printing, and the general excellence of your first number. It is far and away the best Esperanto journal I have seen.

"One of your correspondents, I see, urges that her age (71) precludes the possibility of her doing much for Esperanto. I hope not. If she has the same good health as I have, she may have several years before her yet. I am in my 81st year, and though I have a very busy life, I take a great delight in our "Kara Lingvo," and can read it with tolerable ease . . . I am puzzled about the sound of "Eŭ," "Ej," and "Uj" . . . I cannot make out the last line but one on page 9.

Yours, etc.,

E.D.R."

We heartily thank E.D.R. for his interesting and cheering letter. Certainly we all hope to have plenty of time before us in which to propagate "La Karan Lingvon."

To deal with the last point first, it was one of the printer's errors which one must inevitably find

in a journal printed in a new language. "Firmo firinoj" should have been the one word "Firmoj." Our good colleague, Mr. Ahlberg, is thus fully exculpated from what at first sight must have seemed to our readers as "very original Esperanto" on his part. In apologising for the error, we would again call the attention of our readers to the motto at the top of page 1.

The *Eŭ* is very rare, generally found in *Eŭropo*, which is pronounced as *Ay-oo-roh-po*, just as if the ordinary *u* had been used. The letter *ŭ* has no individual sound, as was explained in our last issue. *Ej* in *plej*, and all other cases, has the value of the *aji* in playing. *Uj* as in ruin. Take for example the word *Patrujo*. This is spoken *Pah-troo-yo*. Similarly *Lernejo* is *Lairn-eh-yo*.

J.H.M. of Walthamstow writes a congratulatory letter in Esperanto, concluding with the request that we explain the etymology of three words used in the Gazette. "Klopoti," meaning "to busy one's self about something," is derived from the Polish: *klopotac sie*. "Ĉerpi," meaning "to exhaust," comes from the Polish: *czerpac*. "Varbi," "to enrol," from the German: *bewarben*.

N.B.—It is remarkable, considering that Dr. Zamenhof is a Pole, that there are not more Slavonic words in Esperanto.

Philologists will find the Universal Dictionary (in Esperanto, French, English, German, Russian, and Polish) a useful work. Price 1s., post free.

Friends have written suggesting that we should have monthly competitions for the best translations from given passages in English literature. The idea is an excellent one, but we cannot adopt it at present, as our time is too fully occupied to enable us to give the requisite amount of care to the competitors' efforts. Nevertheless, we hope for an interesting competition in the near future. We need original work, however, more than translations. Meanwhile we offer a Prize (the Will o' the Wisp English-Esperanto Dictionary, which really ought to be ready by Christmas) to all friends who can send us the annual subscriptions of ten new subscribers. Of course secretaries and officials of groups are not included in this offer.

We are glad to state that we have received numbers of interesting letters. Our inveterate foe, space, forbids our printing all we wish. We trust that our friends will be satisfied with the written replies which are generally sent when their letters are crowded out.

## DIVERSAJ SCIIGOJ.

Samideanoj en Boulogne-sur-Mer faris publikan pruvon pri la utileco de Esperanto per tiu ĉi gazeto. Trovinte Francajn amikojn kiuj komprenis la Anglan lingvon, ili petis ke tiuj ĉi traduku en la Francan la dulingvajn artikolojn en nia unua nombro. La Esperantistoj ankaŭ faris same. La rezulto estis rimarkinda. La tradukoj de la Esperantaj adeptoj estis pli akurataj ol tiuj de la studentoj de la Angla lingvo. Tiel oni praktike pruvis ke Esperanto estis ankaŭ taŭga ilo per kiu lerni naturajn lingvojn! Ili ankaŭ sammaniere tradukis *La Suno Hispana*.

\* \* \*

Ni bedaŭras ke ni ne havas sufiĉe da spaco por doni ĉiumonate malgrandan priskribon pri niaj samtempaj gazetoj Esperantaj. Eble la Lingvo Internacia, L'Esperantiste kaj la Belga Sonorilo estas tiel bone konataj de nia legantaro kiel estas La Lumo. Sed tre malgranda nombro de Anglaj Esperantistoj vidis la novan (mi estis dironta la plej novan sed *tiu ĉi* ESPERANTIST estas la lastenaskita) *Hispana Suno*. Ĝi estas dekdupaga monata gazeto en la lingvoj Hispanaj kaj Esperantaj, kaj enhavas multe da tre interesa kroniko. Oni ne trovas rakontojn aŭ poemojn, sed la organo estos tre utila por ĉiuj kiuj deziras lerni la lingvon de Cervantes; ĉar la paralelaj tradukoj estas laŭvortaj.

\* \* \*

La Sekretario de la Edukado Regnafako<sup>1</sup> skribis, antaŭ ne longe, al Sinjoro Ellis (Keighley), respondante je lia propono ke la instruado pri Esperanto fariĝus parton de la edukada kurso en la lernejoj popolaj kaj dugradaj. Li diris ke "La fakestroj ne estas pretaj por akcepti la proponon nuntempe." Movi regnan fakon estas longa afero, sed esperu fajrereto kuŝas kaŝe en tiu vorto *nuntempe*.

\* \* \*

Sinjoro Ellis ankaŭ sciigas nin ke Sinjoro Wackrill, Colombo, Ceylon, komencis kurson, esperante plioficiale fondiĝi societon kiam la membraro estos plimultiĝinta.

Ni bonvolas sukceson je lia entrepreno, kiu speciale interesas nin ĉar ĝi estas la unua peno por disvastigi Esperanton en Ceylon.

\* \* \*

Sinjoro Metcalfe diras ke li nun komencis korespondan ŝakludon kun Subleŭtenanto L. Jamin

(Antverpano). Ambaŭ el ili ĉiam skribas en Esperanto kaj Sinjoro Metcalfe nun atendas la kvaran movon.

\* \* \*

La unua kunveno de la nova Esperanto Society en Brixton estis tre sukcesa. Preskaŭ cent ĉeestantoj aŭskultis paroladon pri la lingvo internacia kaj ĝia gramatiko. Poste, dudeksep el ili membriĝis kaj la ĉiusemajna kurso komencis. Sinjoro E. W. Eagle, 21, Kellett Road, Brixton, estas la Hon. Sek.; kaj li volonte respondos je ĉiuj demandoj pri la nova societo, kies jarabon-pago estas 2s. 6d.

\* \* \*

Jen estas ankaŭ bonaj novaĵoj de Plymouth. Sinjoro Treleaven paroladis ĉe la Athenæum, Plymouth, kaj, post kelkaj tagoj, donos similan paroladon en Liskeard, Cornwall.

Oni devas gratuli tiun ĉi energian varbiston kaj esperi ke la du paroladoj kreas multajn samideanojn kaj eble fondigos novajn kursojn.

\* \* \*

Tiu ĉi estas nur la dua nombro de THE ESPERANTIST, sed ĝi estas la lasta de la jaro 1903a. La Redaktoro deziras sendi internaciajn salutojn al ĉiuj amikoj, ĉu Angloj, ĉu alilanduloj, kaj gratuli ilin pri la bona progreso kiun Esperanto faris dum tiu ĉi jaro. Esperanto ĉiam kreadas entuziasmojn; sekve ĝi kreskadus pli kaj pli rapide.

Antaŭ dekdu monatoj, la bela lingvo estis preskaŭ nekonata en tiu ĉi lando. Nun jen estas tie ĉi almenaŭ 5,000 personojn kiuj aĉetis lernolibrojn; kaj unu lernolibro ofte instruas multajn lernantojn. Kaj tiu ĉi ne estas la plej bona atesto pri la praktikeco de Esperanto. Multaj el niaj ĉitiej samideanoj jam estas adeptoj, kaj skribis bonajn kaj interesajn artikolojn por tiu ĉi malgranda organo. Vere, mi dubas ĉu estus eble ke oni redaktu gazeton en natura lingvo ajn, post dekdu monatoj de lernado; eĉ se tiu lernado estus estinta treege koncentrigita. Sed tia estas la simpleco de Esperanto, ĝia logikeco, ĝia senescepteco, ke oni povas eldoni monatan gazeton en la nova lingvo kaj ricevi la aprobon de Doktoro Zamenhof mem. Vivu Esperanto! Vivu Doktoro Zamenhof! Vivu ĉiuj amikoj kiuj komencas disvastigi la internacian lingvon tra la multlingva mondo!

<sup>1</sup> Board.<sup>2</sup> Enthusiasts.

## THE NEW DICTIONARIES.

With pleasure we announce that both the Esperanto-English and English-Esperanto Dictionaries will be ready by Christmas. Orders are now being booked, and will be executed as soon as possible. Each work is published at 2s. 6d. Send to the Hon. Sec., Esperanto Club, 41, Outer Temple, London, W.C.

## SPECIMEN PAGES.

From THE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY.

From THE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY.

## DIREKCI-O

**direkci-o**, management (manager's office), body of directors.  
**direkt-i**, to direct, to instruct; —o, the direction (to be followed); —ad|o, management of anything; —il|o, helm; —il|ist|o, pilot, helmsman.  
**direktor-o**, director.  
**direktori-o**, directory.  
**dis-**, separating affix: *jet*'i, to throw; —*jet*'i, to throw about; *sem*'i, to sow; —|*sem*'i, to scatter, to disseminate; —|*ig*'i, to separate (active); —|*ig*'i, to separate (mutually); —|*ig*'o, schism, disunion; —|*don*'i, to distribute.  
**disciplin-o**, discipline.  
**disertaci-o**, dissertation.  
**diskont-o**, discount; —i, to discount.  
**diskut-i**, to discuss; —*abl*'a, debatable, discussible.  
**dispon-i**, to dispose (not to arrange).  
**disput-i**, to dispute; —o, quarrel, altercation.  
**distil-i**, to distil; —*ej*'o, distillery; —*il*'o, alambic, still; —*ist*'o, distiller.  
**disting-i**, to distinguish; —|*ig*'i, to distinguish one-

## DOMAĜ-O

self, to become famous; —|*ig*'a, distinctive.  
**distr-i**, to take away the attention; —o, the act of taking away the attention; —a|'o, want of attention; —*ec*'o, state of inattention; —|*it*'a, absent-minded.  
**distrikt-o**, district.  
**diven-i**, to guess.  
**divers-a**, diverse, varied.  
**divid-i**, to partake, to share; —ad|o, division (arithm.); *ne*—|*it*'a, undivided; *ne*—*abl*'a, indivisible.  
**divizi-o**, division (milit.).  
**\*do**, therefore, consequently, then (argumentative).  
**dogm-o**, dogma; —a, dogmatic.  
**doktor-o**, doctor.  
**dokument-o**, document.  
**dolar-o**, dollar.  
**dolc-a**, sweet; —|*ig*'i, to sweeten, to assuage.  
**dolor-i**, to pain, to ache; —o, pain, ache.  
**dom-o**, house; —*el*'o, cottage, small house; —an|o, one belonging to the house; —e, at home; *ir*'i—*e*|n, to go home.  
**domaĝ-o**, pity, (i.e. regrettable affair); *est*'as —o, it is a pity.

## Douche

**Douche**, duŝo.  
**Dough**, kneĉlaĵo.  
**Dove**, kolombo.  
**Dovecot**, kolombejo.  
**Down**, lanugo.  
**Downs**, sablaj montetoj.  
**Downfall**, falego.  
**Douvy**, doto.  
**Downwards**, malsupre.  
**Doze**, dormeti.  
**Dozen**, dekduo.  
**Draft** (bill of exchange), kambio.  
**Drag**, treni, tiri.  
**Dragon**, drako.  
**Dragon fly**, libelo.  
**Dragoon**, dragono.  
**Drake**, anaso.  
**Drama**, dramo.  
**Dramatical**, drama.  
**Dramatist**, dramafitoro.  
**Drape**, drapiri.  
**Draper**, drapvendisto.  
**Drastic**, drastika.  
**Draught-board**, dama tabulo.  
**Draughts** (pieces), damoj.  
**Draughtsman**, desegnisto.  
**Draw** (water from well), ĉerpi.  
**Draw** (pull), tiri.  
**Draw after** (load, etc.), posttiri.  
**Draw** (near), proksimigi.  
**Draw** (lots), loti.  
**Draw** (together), kuntiri.  
**Drawer**, tirkesto.

## 51

## Droll

**Drawers** (garment), kalsono.  
**Drawing** (lots), lotado.  
**Dray**, ŝarĝveturilo.  
**Dread**, timi, timegi.  
**Dread**, teruro, timo.  
**Dreadful**, terurega.  
**Dream**, sonĝi.  
**Dreary**, malgaja.  
**Dredge**, skrapii.  
**Dredger**, skrapilego.  
**Dregs**, feĉo.  
**Drench**, akvumi.  
**Dress** (clothe), vesti.  
**Dress** (wound), bandaĝi.  
**Dressing case**, necesujo.  
**Dress coat**, frako.  
**Dressing gown**, negliĝa vesto.  
**Dressmaker**, kudristino.  
**Dressing room**, tualetejo, vestejo.  
**Drill**, bori.  
**Drill** (tool), borilo.  
**Drill** (military), ekzerco.  
**Drink**, trinki.  
**Drink** (to excess), drinki.  
**Drink**, trinkaĵo.  
**Drinkable**, trinkebla.  
**Drip**, guteti.  
**Drive away** (expel), forpeli.  
**Drive** (in carriage), veturi.  
**Drive back** (repel), repeli, repuŝi.  
**Drivel**, kraĉoti.  
**Driver** (car, etc.), veturisto.  
**Droll**, ridinda, ŝerca.

*In order that this Gazette may be useful as a propoganda agent, it has been considered advisable to include in each number a synopsis of the Grammar of Esperanto, so that those hitherto ignorant of its system may be the better able to appreciate the magazine.*

## SYNOPSIS OF THE GRAMMAR.

The ALPHABET is composed of 28 letters. They are the following:—

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U V Z and Ŭ.

The VOWELS are always given a long sound; as in the well-known phrase, "Pa, may we go too?" Shorthand students will at once recognise them as the long vowels of "Pitman." Their sound can also be illustrated by—"Bart, Bait, Beat, Boat and Boot."

The following CONSONANTS need special attention. It must be remembered that the sounds given are invariable, because *Esperanto spelling is phonetic and each letter has only one sound*:—

The letter Ĉ is sounded as in Czar, or as the "ts" in Bits.

|   |   |   |   |   |   |
|---|---|---|---|---|---|
| " | " | Ĉ | " | " | Church.   |
| " | " | G | " | " | Gag; <i>i.e.</i> , the hard sound.                              |
| " | " | Ĝ | " | " | George; <i>i.e.</i> , the soft sound.                           |
| " | " | H | " | " | His; <i>i.e.</i> , it is aspirated and never mute as in French. |
| " | " | Ĥ | " | " | Loch; <i>i.e.</i> , the Scotch or German "CH" or Spanish "J."   |
| " | " | J | " | " | the English letter Y. Thus Paroloj is sounded Paroloy.          |
| " | " | Ĵ | " | " | the French J in Bijou or the S in the English word Pleasure.    |
| " | " | S | " | " | in Sun; never as in Rose (Rozo in Esperanto).                   |
| " | " | Ŝ | " | " | in She.   |

The English letters Q, W, X and Y do not exist in Esperanto.

The letter Ŭ is only found in diphthongs—Baldaŭ is sounded Bahldow.

The one remaining point to be mentioned is that "AJ" is the same as in By. "OJ" as in Boy.

ALL NOUNS end in O in the nominative singular. Birdo, a bird.

When the direct object to a verb, an N is added to this O. Mi havas birdon, I have a bird.

All nouns form the PLURAL by adding J to the singular. Birdoj, birds. If objective, birdojn.

All ADJECTIVES end in A and agree with the noun in number and case. Mi havas belajn birdojn, I have beautiful birds.

The INFINITIVES of VERBS always end in I. Lerni, to learn. Pensi, to think.

PRESENT INDICATIVES end in AS in all persons singular and plural. Mi iras, I go. Ili iras, they go.

PAST INDICATIVES end in IS in all persons singular and plural. Mi iris, I went. Ni iris, we went.

FUTURE INDICATIVES end in OS in all persons singular and plural. Ŝi iros, she will go.

CONDITIONAL MOOD ends in US in all persons singular and plural. Li irus, he would go.

IMPERATIVE MOOD ends in U. Parolu! speak! Iru! go!

SUBJUNCTIVES are formed by using "KE" and the Imperative. Ke mi iru, that I might go.

The PRESENT PARTICIPLE ACTIVE ends in ANTA—Iranta, going. In the Passive voice in ATA—Farata, being done.

PAST PARTICIPLE ACTIVE ends in INTA—Irinta, having gone. In the Passive voice in ITA—Farita, having been done.

FUTURE PARTICIPLE ACTIVE ends in ONTA—Ironta, about to go. In the Passive voice in OTA—Farota, about to be done.

ADVERBS end in E—Bone, well. Bele, beautifully.

1. The DEFINITE ARTICLE is invariably LA in all cases singular and plural. La Patroj, the Fathers.

2. There is no indefinite article in Esperanto. Patro, a Father; or merely Father, as the case may be.

3. "NOT" is expressed by "NE." Mi ne havas amikon, I have not a friend.

4. Questions are introduced by "Ĉu." Ĉu mi ne havas amikon? Have I not a friend?

5. ESTI, to be, is the auxiliary verb in Esperanto. Havi, to have, is never an auxiliary.

N.B.—There are no exceptions or irregularities in Esperanto.

The VOCABULARY has been simplified by about 30 affixes, which are used to modify the meanings of root words. The commonest are the following PREFIXES :—

BO indicates relationship by marriage. Bofrato, Brother-in-law.

DIS indicates separation, as in English. Dissiri, to tear to pieces.

EK indicates the commencement of an action. Eklerni, to begin to learn.

MAL is always used to indicate OPPOSITES. Varma, warm. Malvarma, cool. Amiko, friend. Malamiko, enemy.

RE denotes the repetition of an action. Relerni, to relearn. Rediri, to say again

The principal SUFFIXES are the following :—

AĴ signifies an object made from—thus, Fruktaĵo, something made from fruit.

AR signifies a collection of. Arbo, a tree. Arbaro, a forest.

EBL signifies possibility. Videble, visibly. Lernebla, learnable.

EC signifies an abstract quality. Boneco, goodness. Beleco, beauty.

EG signifies increase. It is the augmentative suffix. Granda, large. Grandega, immense.

EJ signifies the place where an action takes place. Lernejo, school. Preĝejo, church.

ET is the diminutive suffix. Infaneto, a little child. Varmeta, lukewarm.

IG denotes the causing of an action. Morti, to die. Mortigi, to kill.

IĜ denotes turning or becoming. Paligi, to turn pale. Fortigi, to become strong.

IL denotes the instrument by which an action is performed. Kudri, to sew. Kudrilo, a needle.

IN denotes the feminine. Patro, father. Patrino, mother. Onklo, uncle. Onklino, aunt.

IST denotes the occupation, or means of livelihood. Botisto, bootmaker. Servisto, manservant.

UL denotes the possession of a Quality or Attribute. Blindulo, a blind man. Danculo, a dancing man.

By means of these affixes, the Vocabulary is enormously simplified.

---

All should have "The Student's Complete Text Book," 1s. 8d., post free, and "Twelve Exercises," 1s. 3d. in order to thoroughly learn the system; but the above is serviceable as a rough basis.

---

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.

The books most read are:—

"Student's Complete Textbook," by J. C. O'Connor, B.A., 1s. 8d., post free.

"Twelve Exercises with Key," by A. Motteau, 1s. 3d., post free.

"No. 52," a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d. the set.

"Hamlet," translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Complete Stories from back "L'Espérantistes," 2d. each.

"Tourist's Phrase-Book," in 6 languages, 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are:—

"La Lingvo Internacia," printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

"L'Espérantiste," in French and Esperanto, 4s.

"La Lumo," in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Belga Sonorilo," in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Bohema Esperantisto," in Czech and Esperanto, 3s.

"La Rondiranto," in Bulgarian and Esperanto, 3s.

The new "Internacia Medicina Revuo" will appear every two months. Subscription 6s. 6d. per annum.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries will be ready shortly. Price 2s. 6d. each.

"French-Esperanto Vocabulaire," 2s. 6d.;

"Esperanto-French Dictionnaire," 1s. 6d.

"Braille Instruction-Book for the Blind," 4s.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.



No. 3.

THE

January, 1904.

# ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the spreading  
of the International Language.

Edited by H. BOLINGBROKE MADGE.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3 - (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Published by THE ESPERANTO CLUB, 41, Gutter Temple, London, W.C.

## CONTENTS.

|   | Page  |
|---|-------|
| EDITOR'S NOTES ... ..   | 23-25 |
| LETTERS (Sir William Ramsay) ... ..   | 36-37 |
| TWO PAROLS (Esperantisto 3300) ... ..   | 37    |
| NOBLESSE BREVES (Ben Elmy) ... ..   | 37    |
| A PROVERBIAL NIGHT (Edward May<br>hall, M.A.) ... ..                          | 38-39 |
| THE TEMPEST, continued from pages 5<br>and 21 (translated by A. Madge) ... .. | 40    |
| CAJANARCA (translation by Clarence Dickson) ...                               | 41    |
| EVESING (Carlo Bourlet) ... ..  | 41    |
| DOMINIONS OF DIVINE LIGHT ... ..  | 42    |
| THE ANTIQUARY OF THE MOUNT (Ben Elmy) ...                                     | 43    |
| A TRUE TALE (Esperantisto 4080) ... ..  | 44    |
| HENRIETTE FLEMING'S WHISTLE ("Kobus") ...                                     | 44    |
| THE PIRATE DOCTOR (Esperantisto 3379) ... ..                                  | 44    |
| CONGREGATIONALIST NOTES ... ..  | 45    |
| VALUOUS ITEMS OF INTEREST ... ..  | 46    |
| SYNOPSIS OF THE QUARTER ... ..  | 47-48 |

FOR FREE PARTICULARS write to  
the HON. SECRETARIES of  
ESPERANTO SOCIETIES at

BURNEBOOTH, I. F. H. Woodward, Esq.,  
Newcomb St. Southwick Road.

DUBLIN, C. Fournier, Esq.,  
Celtic Association, St. Stephen's Green.

EDINBURGH, Miss Tweedie, M.A.,  
2, Spence Square.

GLASGOW, J. Hunter, Esq.,  
108, Tweed St. St. Nicholas Place.

HULL, H. H. Taylor, Esq.,  
12, Beale Hall Road.

KEDDLEBY, J. Ellis, Esq.,  
Guspy's Buildings, New Street.

LONDON, H. Bolingbroke Madge,  
41, Gutter Temple, W.C.

NEWCASTLE, H. W. Clapham, Esq.,  
3, Oswald Terrace, Goswick.

PLYMOUTH, J. A. Tull, Esq.,  
9, Bignon Crescent, Narbonne St.

PORTSMOUTH, Dr. Greenwood,  
20, St. George's Square.

STURTON, P. Howard, Esq.,  
The Rectory, Gainsborough.

TYNESIDE, A. Davidson, Esq.,  
26, Park Lane, St. Nicholas.

Single copies are sent free of postage to the Editor of the  
Gazette, 41, Gutter Temple, W.C., London, W.C., on receipt of  
the price of the copy, and the name of the subscriber.  
Orders for single copies should be sent to the Editor of the  
Gazette.

# The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!  
THE INTERNATIONAL MACHINE.

Delight in the International  
The common bond of unity of all civilized people.

See Remington type the duplicate of the  
Contract.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
146 Broadway St., London, E.C.

# La Remington

LA UNIVERSAL ESCRIBIASINA.

*Primo in Italia!*  
LA INTERNAZIA MASINO.

La Masino di un solo tipo.  
La Masino universal per ogni condizione popolare.

See Remington type the duplicate of the  
Contract.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
146 Broadway St., London, E.C.

## To Interest Your Friends.

No. 1120 de las Librerías P. OUYARD, Snc.,  
The Boulevard, Leques Park, London, Ag 6  
copied of No. 1120. These are subsequently to  
be returned with 1/2 cent, and exchanged for The  
Contract Book of Design.

## LINGVO INTERNACIA.

A Monthly Journal of the Esperanto Club, London.  
M. P. O. 1120/1121.  
Annual Subscription 1/6. With January Supplement, 1/8.

Sent to the Librerías, Esperanto Club,  
Single Numbers, 4s.



The **BEST** and  
most **Useful**  
Present for all  
who write, and the  
**Best Man's Right**  
Hand.

# Waterman's IDEAL Fountain Pen

THE RIGHT WRITING PEN.

Does Not  
Leak.

Does Not  
Blot.

Does Not  
Spurt.

The Right Pen  
and the  
Wrong Pen.

See the difference. Waterman's Ideal  
Fountain Pen is the right pen. It is right in every way. You  
get a full pen right, to suit your hand. It is  
always there, and you get no need to it, no other pen is right. The  
ink supply is right, no leaking, blotting, no spitting or smudging.  
The writing is right. There are no sudden stops. The pen always  
keeps right on.

**WATERMAN'S IDEAL.**

The Pen that is just right every way.

All machines, fountain, etc., from 10/6. An Silver and Gold for  
Presentation. Sent free daily Illustrated Catalogue, post free from

**L. & C. Hardtmuth,**

12, GOLDEN LANE, LONDON, E.C.

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAGOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĜE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
CANADA.—A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal.  
FRANCE.—M. Paul Fruictier, Boulevard Arago 27, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—G. B. Smith, Esq., 19, Wiborg Quay, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnagatan, Stockholm.  
TRINIDAD.—Geo. O. Messerly, Esq., Port of Spain.

*Nepresitatajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis postsignon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

No. 3.

JANUARO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

KORESPONDANTE, NI LERNADAS.

IN CORRESPONDING, WE LEARN.

La Nova Jaro komencas. Saluton! Ĝi estu feliĉa por ĉiuj Gesamideanoj tra la Esperanta Mondo. Kaj ĝi estu feliĉa por la kara lingvo mem!

La jaro 1903 a estis bonega, eble la plej bona kiun Esperanto estas ĝis nun vidinta—sed ni fidu ke la venonta jaro estos ankoraŭ pli bona.

*The Esperanto Club* ankaŭ komencis novan jaron. Ĉion, kio estis farebla per ĝiaj malgrandaj financoj, la Klubo faris por disvastigi la lingvon; kaj estas mirinde kiom malmultaj entuziazmuloj povis fari dum kelkaj monatoj de senfina klopodado. Ĉiuj Esperantistoj kaj iliaj amikoj estas invitataj al ĝia Jarkunveno ĉe Essex Hall, Strand, Jan. 14, 1904, 7-10.

Ĉiulandanoj trovas plezurega la propagando de Esperanto. Nia legantaro ŝatos la belajn vortojn de Doktoro Gustav Busuttill (Malto), kaj sendube ĝi donos egalan plezuron legi la sekvantan leteron de Doktoro Ostrovsky (Jalta, Rusujo).

“Tre estimataj Kunfratoj: Mi ĵus ricevis la Numero 1 de via Gazeto, THE ESPERANTIST. Koregan Gratulon pri tiu ĉi nova grava propagandilo de nia kara Esperanto! Mi konas la lingvon internacian de 1891 jaro, tamen ĝis nun, mi ne forgesas la mirindan impreson kian faris je mi Esperanto. Al mi ŝajnis, kvazaŭ iu forprenis de

The New Year begins. Greeting! May it be happy for all fellow-thinkers throughout the Esperanto world. And may it be happy for the prized language itself.

The year 1903 was excellent—possibly the best which Esperanto has yet seen—but let us trust that the coming year will be even better.

*The Esperanto Club* also has commenced a new year. All that was possible with its slender funds the Club has done to spread the language, and it is wonderful how much a few enthusiasts have been able to do during some months of ceaseless activity. All Esperantists and their friends are invited to its Annual Meeting at Essex Hall, Strand, on January 14th, from 7—10 p.m.

People of every nationality find the propaganda of Esperanto most pleasurable. Our readers will appreciate the beautiful words of Dr. Busuttill (Malta), and doubtless it will give equal pleasure to read the following letter of Dr. Ostrovsky (Yalta, Russia):—

“Esteemed Brethren,—I have just received No. 1 of your Gazette, THE ESPERANTIST. Most hearty congratulations on this new important means of propagating our dear Esperanto! I know the international language since 1891, yet up to the present I do not forget the wonderful impression which Esperanto produced upon me.

miaj okuloj ian pezan kurtenon, kiu malhelpis min vidi la Dian mondon. Esperanto kvazaŭ malfermis antaŭ mi larĝan pordegon, eniron en grandegan, belan palacon, kie mi ĉiam renkontadis multajn, kvankam nekonatajn, tamen tre karajn al mi gefratojn, kiujn mi iam perdis, kaj nun denove trovadas. Korespondante, jen kun tiuj, jen kun aliaj nacioj, mia horizonto fariĝadis ĉiam pli kaj pli larĝa; kaj mi pli kaj pli ĝuadis la grandegan ĝojon estadi en tiu ĉi ĉarma palaco, kune kun ĝiaj noblaj loĝantoj. Hodiaŭ via bela, tre simpatia THE ESPERANTIST denovo plenigis mian animon per nova vera ĝojo. Ĝi kvazaŭ enkondukis min en novan, ĝis nun nekonatan de mi, grandegan ĉambron de tiu palaco, en vian estimindan Britujon, en unu el plej belaj, plej luksaj apartaĵoj de tiu ĉi palaco, kie espereble ankoraŭ mi trovos novajn, sincerajn, noblajn gefratojn. La impresado estas sorĉe! Vivu la konstruistoj de tiu ĉi mirinda palaco! Vivu la Esperantistoj!!”

Ni esperas ke la aminda Doktoro Ostrovsky trovos multajn korespondantojn en nia lando. Por tiu ĉi celo ni fidas ke nia legantaro plene utilos la adresareton sur la kovrilo de tiu ĉi Gazeto. Tiel ili ne nur helpos Esperanton, sed ankaŭ sin mem, ĉar, *korespondante ni lernadas*. [Ĉiuj el la anoncoj en THE ESPERANTIST estas indaj je atento.]

Ni povus skribi multajn paĝojn pri la progreso farita de Esperanto dum la lasta jaro, sed nun ni nur donos la notindojn de Decembro, 1903.

Jam longe Esperantistoj deziregis taŭgan stilmodelan skribaron. Por plenumigi tiun bezonon, Doktoro Zamenhof ĵus eldonis interesan kaj utilegon verkon. Jen kelkaj frazoj el ĝia Antaŭparolo:—“Por ke ĉiuj povu uzi la lingvon egale, estas necese, ke ekzistu iaj modeloj, leĝdonaj por ĉiuj. Tio ĉi estas la kaŭzo, pro kiu, cedante al la peto de multaj Esperantistoj, mi eldonis *Fundamentan Krestomation* kiu povos servi al ĉiuj kiel modelo de Esperanta stilo, kaj gardi la lingvon de pereiga disfalo je diversaj dialektoj. Atentan tralegon de la *Fundamenta Krestomatio* mi rekomendas al ĉiu, kiu volas skribi aŭ paroli uzi la lingvon Esperanto. Ĉiuj artikoloj estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ, se ili estas skribitaj de aliaj personoj, ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mein uzas. L. ZAMENHOF.

La unuaj paĝoj enhavas simplegajn frazojn. Je la dekoka paĝo komencas fabeloj kaj legendoj. Tiam aperigas multaj anekdotoj, rakontoj, sciencaj artikoloj kaj, laste poezio. Eble estas bedaŭrinde

It seemed to me as if someone had taken away from before my eyes some heavy curtain, which prevented my seeing God's world. Esperanto, as it were, opened before me a wide portal, the entry into a palace vast and beautiful, where I have ever met many brethren, albeit unknown, yet very dear to me, whom once I lost and now have found again. Corresponding with persons of one and another nationality, my horizon has continued to become wider and wider, and I more and more have revelled in the great joy of being in this charming palace, together with its noble denizens. To-day your attractive, very congenial THE ESPERANTIST has once again filled my soul with a new, true joy. It has, as it were, introduced me into a hitherto unknown, immense new chamber of that palace, into your estimable Britain, into one of the most handsome, most luxurious apartments of this palace, where I hope I still shall find new, sincere, noble brethren. The conception is bewitching! Long live the builders of this wonderful palace! Long live the Esperantists!!”

We hope that the amiable Dr. Ostrovsky will find many correspondents in our land. To this end we trust that our readers will fully utilise the address list on the cover of this Gazette. They will thus not only help Esperanto, but also themselves, for in corresponding we learn. [All the advertisements in THE ESPERANTIST are worthy of attention.]

We could write many pages on the progress made by Esperanto during last year, but now we will only give the memorabilia of December, 1903.

For a long time past Esperantists have greatly desired a suitable collection of writings as a model of style. To fulfil this requirement, Dr. Zamenhof has just brought out an interesting and most useful work. Here are some phrases from its foreword:—“In order that all shall be able equally to use the language, it is necessary for some models to exist which shall lay down the law for all. This is the reason why, having given way to the request of many Esperantists, I have brought out the *Fundamenta Krestomatio*, which can serve as a model of Esperanto style for all, and can guard the language from the fatal falling away into different dialects. I recommend the attentive perusal of the *Fundamenta Krestomatio* to all who wish to use written or spoken Esperanto. All the articles are either written by myself, or, if they are written by others, they have been by me corrected, so that their style shall not diverge from that which I myself employ.”

The first pages contain simple phrases. At the 18th page commence fables and legends. Then appear many anecdotes, tales, science articles, and lastly poetry. It is possibly a matter for regret

ke la bona Doktoro enpresis 38 paĝojn el sia *Hamleto* kaj 17 paĝojn el la *Iliado* de Sinjoro Kofman, ĉar multaj Esperantistoj jam havas tiujn ĉi verkojn. Sed sendube la aliaj 403 paĝoj sufiĉos por montri perfektan stilon. (Kosto 3/- afrankite de la "Librarian," Esperanto Club).

Alia utila eldonaĵo estas "Komercaj Leteroj" redaktite de Sinjoroj Berthelot kaj Lambert, kiu certe faciligos la uzon de Esperanto inter niaj komercaj samideanoj. Ĝi enhavas 34 leterojn pri diversaj aferoj, kaj vortaron en la lingvoj Esperanta, Franca, Germana kaj Angla. (Kosto 7d. afrankite).

Sinjoro Rhodes sendis al ni ekzempleron de sia nova *Key to the Ekzercaro*. Ĝi estas tre bona verketo, kaj ĉiuj Esperantistoj kiuj havas la *Ekzercaron* certe estos saĝaj sendante 35 centimojn por ĝia traduko en la Angla lingvo. Sinjoro Rhodes ankaŭ komencis tradukon de Bunyan's *Pilgrim's Progress*, kaj kredeble niaj legantoj baldaŭ vidos specimenon de THE ESPERANTIST. Alia specimeno kiun ni esperas presigi estas el la traduko de la *Rubaiyat of Omar Khayyam*, verkita de nia agema kunverkanto, Sinjoro Ben Elmy. Kvankam estas bedaŭrinde ke Esperantistoj tiel lertaj, kiel estas tiuj ĉi adeptoj, ne ĉiam skribos originalaĵojn, ni tamen deziras la sukceson de la du libroj, kaj ni esperas je originalaĵoj de ili kaj de ĉiuj adeptaj Samideanoj.

Mi deziras danki ĉiujn, kiuj sendis proponojn pli la plibonigo de la Gazeto. Laŭdeziro ni nun presigos sciencan kolonon. Niaj legantoj scias iom pri la ĵuseltrovitaj ecoj de Radiumo, la plej nova miraĵo de la ĉia mondo. Mi kuragiĝis skribi al Sir William Ramsay, petante ke li helpu la Esperantan Aferon, aminde skribante por ni artikolon pri Radiumo. Mi plezure anoncas ke li ne nur promesis tion fari, sed ke lia respondo estis Esperante skribita.

Sinjoro Seynaeve proponis Esperantan Kunvenon Londone dum tiu ĉi jaro, kiam ĉiulandaj delegitoj pripensus pri Internacia Esperanta Akademio. Bonega ideo! Se niaj transmaraj amikoj venos ĉi tie, ili povos esti certaj ke ni faros ĉion, kion ni povos, por helpi je la fondaĵo de Akademio, kaj ankaŭ por plezurplenigi ilian libertempon.

LA REDAKTORO.

P.S.—Ni ĵus ricevis pruvon de alia nova verketo, "A New Hobby that may bring you a Living." Ĝi estas interesa bonepresata ilo por disvastigi la lingvon, kaj estas eldonata de "The Esperanto Literature Agency," Colchester. La Librarian de la Esperanto Club (P. H. Howard, Esq., The Bungalow, Cranes Park, Surbiton) sendos ĝin je ricevo de 7d.

that the good Doctor has included 38 pages of his "Hamlet" and 17 from the "Iliad" of Mr. Kofman, because many Esperantists already have these works. But undoubtedly the other 403 pages will suffice to manifest perfect style. (Price 3s., post free, from the Librarian, Esperanto Club).

Another most useful publication is "Komercaj Leteroj," edited by Messrs. Berthelot & Lambert, which will certainly facilitate the use of the language among our commercial friends. It contains 34 letters on divers matters, and a vocabulary in Esperanto, French, German, and English. (Price 7d., post free).

Mr. Rhodes has sent us a copy of his new *Key to the Ekzercaro*. It is a good little work, and all Esperantists who have the *Ekzercaro* will certainly be wise in sending 2½d. for its translation into English. Mr. Rhodes has also commenced a translation of Bunyan's *Pilgrim's Progress*, and probably our readers will soon see a specimen in THE ESPERANTIST. Another specimen we hope to print is from the translation of the *Rubaiyat of Omar Khayyam*, done by our busy fellow-worker, Mr. Ben Elmy. Although it is to be regretted that Esperantists, so clever as are these experts, do not always write original matter, we nevertheless desire the success of these two books, and hope for original works from them and from all expert friends-in-Esperanto.

I desire to thank all who have sent proposals for improving the Gazette. By request we will now print a science column. Our readers know something about the recently-discovered qualities of Radium, the newest wonder of the chemical world. I had the temerity to write to Sir William Ramsay, asking him to help the Esperanto cause by kindly writing for us an article on Radium. I gladly announce that he not only promised to do so, but that his reply was written in Esperanto.

M. Seynaeve has proposed an Esperanto Congress in London during this year, when representatives from all countries should deliberate concerning an International Esperanto Academy. An excellent idea. If our friends from over the sea will come here, they may be sure we shall do all in our power to help in establishing an Academy, and also to make their holiday pleasurable.

*Literal Translation.*

P.S.—We have just received a proof of another new little work, "A New Hobby that may bring you a Living." It is an interesting, well-printed means for spreading the language, and is published by "The Esperanto Literature Agency," Colchester. The Librarian of the Esperanto Club (P. H. Howard, Esq., The Bungalow, Cranes Park, Surbiton) will send it on receipt of 7d.

## RADIUMO.

*De* SIR WILLIAM RAMSAY, K.C.B., F.R.S.

La strangaj ecoj de radiumo, precipe ĝia brilo en la mallumo, kaj ĝia briligo je aliaj korpoj, altiras la atenton de la tuta mondo. Tiu ĉi radiumo estas metalo, ni kredas, kvankam ĝis nun oni ne produktis ĝin en metala stato, ĉar ĝiaj saloj estas similaj al la saloj de bariumo, blanka metalo, kaj bonekonata elemento. La kaŭzo estas ke oni posedas tiel malmulte da tiuj saloj ke neniu deziras malŝpari ĝin eksperimente, por efektiviĝi la ŝanĝon el salo en metalon, ĉar la perdo estus granda. La plej bone konata salo, la bromido, kostas dek du ŝilingojn po miligramo, kvanto preskaŭ nevidebla.

Ĉiuj metaloj havas siajn proprajn spektrojn; se iliaj saloj estos hejtataj en flamo, rigardante ilin per spektrovindilo, oni vidas koloratajn liniojn proprajn al ĉiu metalo, kiuj estas nomataj ĝia "spekto." Tial metalo estas konebla per ĝia spektro. La radiumo posedas ĝian propran spektrojn, kiu estas simila al la spektro de bariumo, sed malsimila en la lokigo de la linioj. Ni kredas, sekve, ke la radiumo estas elemento simila al la aliaj metaloj.

El la saloj de radiumo elvenas daŭre gaso, kiu havas la econ ke ĝi brilas en la mallumo, dume restante varma, kaj ĝi elĵetas korpetojn nomatajn "elektronojn." Kiam tiuj ĉi korpetoj tuŝas la aeron, aŭ gason ian, ili aldonas al tiu ĉi la povon eligi elektroskopon. Dum tiu ĉi gaso eldonas hejton, kaj dum ĝi ŝutas elektronojn, ĝi malaperas malrapide, kaj anstataŭ, oni ekvidas alian gason tre malpezan kies spektrojn Sinjoro Janssen, fama franca astronomiisto, observis en la suna lumo dum la jaro 1868, kaj kiu unue estis eltrovata sur la tero de la skribisto de tiu ĉi artikolo.

Ŝajnas do ke unu elemento, radiumo, povas produkti alian, heliumon. Ĉu, kiel eble estas, aliaj elementoj formiĝas samtempe, ni ne scias. Tia demando restas por estonta serĉado.

Ni vidu ĉu radiumo posedas iajn ecojn, en speco aŭ grado malsimilajn al tiuj de aliaj elementoj, en kiuj oni ne observis ĝis nun tiajn eksterordinarajn ŝanĝojn.

Unue do, estas almenaŭ du aliaj elementoj kiuj elŝutas elektronojn. Tiuj ĉi estas toriumo kaj uraniumo. Ĉiuj el ili, tiel kiel radiumo, sendube konsistas el multepezaj atomoj. Se ni prenos la pezon de hidrogena atomo kiel unuon, tiu de radiumo pezas ĉirkaŭ 225 (aŭ eĉ eble plie) tiu de toriumo 232, kaj tiu de uraniumo 240.

## RADIUM.

*By* SIR WILLIAM RAMSAY, K.C.B., F.R.S.

The strange qualities of radium, especially its brilliance in the dark and its power of illuminating some other bodies, attracts the attention of the entire world. This radium is, we believe, a metal, although till now it has not been produced in metallic form, for its salts are similar to the salts of barium, a white metal and a well-known element. The reason is that so little of these salts is available that it cannot be wasted in experimenting to effect the change from a salt into a metal, for the loss would be great. The best-known salt, the bromide, costs twelve shillings per milligram, an almost invisible quantity.

All metals have their peculiar spectra. If their salts be heated in a flame, on examining them by means of the spectroscope, coloured lines peculiar to each metal may be seen, which are named its "spectrum." Thus a metal is recognisable from its spectrum. Radium has its particular spectrum, which is like the spectrum of barium, but different in the location of the lines. We therefore believe that radium is an element similar to the other metals.

From the salts of radium a gas continually escapes, which has the quality of shining in the dark, remaining warm the while, and it throws out bodies known as electrons. When these bodies touch the air or any gas they impart to that gas the power to discharge an electroscope. While this gas is giving forth heat and discharging electrons it gradually vanishes, and instead another gas appears, of low density, the spectrum of which M. Janssen, a famous French astronomer, noticed in the light of the sun during 1868, and which was first discovered on the earth by the writer of this article.

It seems, therefore, that one element, radium, can produce another—namely, helium. Whether, as is possible, other elements are formed at the same time we do not know. That question remains for further investigation.

Let us see whether radium possesses any properties, differing in kind or in degree, from those of other elements which have not yet been observed to undergo any such extraordinary change.

First, then, there are, at least, other two elements which discharge electrons. These are thorium and uranium. They all, as well as radium, undoubtedly consist of atoms of great weight. If we take the weight of an atom of hydrogen as unity, that of radium weighs about 225 (or perhaps even more); that of thorium 232, and that of uranium 240.

Ĉar tiuj estas la tri plej pezaj specoj el konataj atomoj, ni povas diveni ke, kiam atomo estas multepeza, ĝi celas al disrompiĝo; ke sammaniere ke oni ankoraŭ vidis nenian stelon kiu posedas grandegecon pli vastan ol, ekzemple, miloble tiun de nia suno (alie ĝi estus malpersista kaj forĵetus sekvanterojn); tiel neniaj elementoj posedantaj pli grandan atomecon ol difinan maksimumon, povas ekzisti, kaj ke tiuj, kiuj, laŭ nia sciigo, posedas tre altan atomecon, estas mem en sia forĵetaĵo de sekvanteroj.

Eble estas permeseble konjekti ke elektronoj estas malgrandaj, kaj atomoj de helio pli grandaj sekvanteroj. Sed preterdatrigi la temon, sen difina koniĝo, kiu nur povas riceviĝi per eksperimentoj, estus malutile.

Kompreneble multe da laborantoj, kiel eble plej ili povas, en la nuna tempo penadas por eniĝi pli profunde en tiujn interesegajn regionojn de esplorado.

*La Leono kaj la Bovoj.*—Tri bovoj sin paŝtis sur herbejo, tre pace kaj amike. Leono jam de longe estis rigardinta ilin kun la espero je kapti ilin, sed sentis ke ne estos ŝanco por tion fari, dum ili kune restados.

Tial li sekrete ekdissemis malbonajn kaj falsajn dirojn pri unu kontraŭ la aliaj, ĝis tio naskis jaluzon kaj malfidon inter ili. Tuj kiam la leono vidis ke ili evitis unu la aliajn kaj sin paŝtis malkune, li sin ĵetis sur ĉiun aparte, kaj tiel sukcesis ke ĉiu el ili fariĝis facila kaptaĵo de la leono.

*Kiam amikoj malpacas, malamikoj profitas.*  
(6266).

*La Rano kaj la Bovo.*—Bovo sin paŝtis en marĉejo kaj okazis premi sian piedegon inter kelke da ranidoj, kaj morte premegis unu el la kovitaro<sup>1</sup>. Postvivanta ranido forkuris al la patrino por sciigi al ŝi la teruran novaĵon.—“Kaj, ho patrino, estas tre granda besto, granda kvarkrura<sup>2</sup> besto. kiu tion faris!”—“Tre granda?” diris la maljuna ranino. “Kiel granda? Ĉu ĝi estas tiel dika?” (kaj ŝi ŝveligis sin multe) “tiel dika kiel tio?”—“Ho!” diris la ranideto, “multe pli dika ol tio.”—“Nu, ĉu ĝi estas tiel granda?” (kaj ŝi ŝveligis sin ankoraŭ plie)—“Certe, patrino, ĝi estas; kaj, eĉ se vi krevigos<sup>3</sup> vin, vi neniam atingos la duonon de ĝia dikeco.”

La maljuna ranino, kolerante ke ŝia povo tiel estas dubata, alian penadon faris kaj vere krevis.

*“Sin tro ŝveligi estas danĝere.”*  
(6266).

<sup>1</sup> Brood.    <sup>2</sup> Fourlegged.    <sup>3</sup> Burst.

As these are the three heaviest kinds of atoms known, we may guess that when an atom possesses a great mass it tends towards disruption; that just as no star has been seen possessing a magnitude greater, let us say, than one thousand times that of our sun (else it would be unstable, and would throw off satellites), so no elements of a greater atomic weight than a certain maximum can exist, and that those which we know to possess very high atomic weights are themselves in the process of throwing off satellites.

It is perhaps permissible to speculate that electrons are small satellites, and that atoms of helium are larger ones. But to pursue the subject further, without more definite knowledge, which can be gained only by experiment, would be unprofitable.

Needless to say, many workers are doing their utmost to penetrate more deeply into this most interesting field of exploration.

## KANTETOJ INFANAJ.

“TWINKLE, TWINKLE, LITTLE STAR!”

Ekbrilu, ekbrilu, malgranda steleto!  
Kio estas vi, multe mi miras;  
Tiel alta, altega, el nia tereto,  
Diamant' en ĉiel' vi aperas.

“THE NORTH WIND DOTH BLOW.”

Blovas norda vento,  
Nega estas sento,  
Kion faros tiam ruĝgorĝeto?  
En grenejo restos,  
Varme tie nestos,  
Sub flugil' kaŝite la kapeto.

“HEY, DIDDLE DIDDLE!”

Babilo, babilo!  
Kato kaj violoneto,  
Bovino super lunon eksaltante;  
Hundetio multe ridis,  
Ludeton kiam vidis,  
La plado kun kulero forkurante!

“LITTLE JACK HORNER.”

Ĵak Horner malgranda,  
En kojno sidanta,  
Kun pasto de prunoj sin festas;  
Enmetis fingregon,  
Eltiris prunegon,  
Kaj diris, “Knab' bona mi estas!”

*Tradukis BEN ELMY.*

## NOKTO TERURA.

*Originale verkita de EDWARD METCALFE, M.A. (OXON).*

Estas tre granda ĉambro, mi eĉ povas diri grandega, sed la lito, antikva kaj per densaj kurtenoj ĉirkaŭata, estas tute en angulo.

Sur tiu-ĉi lito kuŝante mi vidas palan lumon enirantan tra la du fenestroj. Per fantoma lumo ĝi lumigas la flankkurtenojn, tiel, pro ilia blankeco kaj diafaneco, igante strangan kontraston kun la densaj kaj malhelaj kurtenoj de la lito. Per malforta radio ĝi transiras la ĉambron, kaj per tremeta lumo montras la masivan pardon ĉe la kontraŭa flanko de la ĉambro.

Ĝuste tiamaniere timema infaneto tuŝus la kapon de kuŝanta hundo.

Kontraŭ tiu ĉi pala lumo silente sed forte bataladas la mallumo.

Maltrankvileco stranga kaptas min; ne povante plu dormi, mi leviĝas kaj aliras al la pli malproksima el la du fenestroj.

Estas kvazaŭ ia nekonata forto altirigis min.

Grandaj multpezaj fenestroj, ĉiu el ili havante tri kadrojn, el kiuj la plej malaltaj estas malfermitaj, kaj, tra la du malfermaĵoj, malvarma aero enfluas en la ĉambron.

Mi sentas min tremetantan de—malvarmo, aŭ ĉu estas—de ia antaŭaverto<sup>1</sup> pri danĝero?

Ekstere mi vidas grandan, antikvan korton, tute per ŝtonegoj pavimatan. Je tri flankoj malaltaj konstruaĵoj—ĉeval—aŭ bovinejoj—ĝin ĉirkaŭas, sed, dekstre de mia ĉambro kaj apude, staras altega nerompita muro.

Kune kun mia ĉambro ĝi formas la kvaran flankon de la korto.

Klinante la korpon duone el la fenestro, nur la alia dekstra fenestro de la ĉambro min apartigas de tiu nerompita muro.

En la korto mi vidas du virojn, eble ĉevalistojn. Sed kion ili estas farontaj noktmeze en tiu antikva korto? Kial ili tiel senbrue kiel fantomoj moviĝas?

Kaj pri kio ŝajnas ili ion timi? Maldikaj kiel ombroj ili ensorĉas min.

Unu el ili en kortmezon alportas benketon, sur kiun la alia metas lignan duontubon—tiam, kiam antaŭe oni fiksas laŭlonge la randoj de tegmentoj, por ke ĝi ricevu pluvakvon—klinigante ĝin tiamaniere ke la maldekstra finiĝo estas je la alteco de genuoj, kaj la dekstra de la brusto de homo.

Ili firmigas ĝin per fortaj subtenaĵoj, kaj enpakis en la pli alta finiĝo kvazaŭ mureton el drapo.

Tiel silente ili laboras ke oni povas aŭdi nur la plej mallaltan soneton.

Tiam, enirante en unu el la malaltaj konstruaĵoj, ili tie restas kelkajn minutojn kaj tiam revenas strangege vestataj. La kruroj<sup>2</sup>, korpo, brakoj kaj, escepte la okuloj, la tuta vizaĝo, estas envolvataj per densaj kovriloj, kaj mi rimarkas densegajn gantojn sur la manoj. Vere la maldikuloj estas fariĝintaj dikeguloj!

Ili ambaŭ portas ŝarĝojn<sup>3</sup>; la unua pezan ŝovilon feras tre profundan; la dua ledan sakon.

Kion ĝi enhavas? mi demandas min. Io, videble, de grandega malkvieteco. Ŝajnas esti viva, la sako mem. Dekstren, maldekstren, antaŭen, malantaŭen ĝi saltas, aŭ pli korekte diri, ĝi estas saltigita.

De-nove mi sentas tremfroston. Mi komprenas nun la altiradon. El tiu ĉi io eliras la forto altira, kaj vere ĝi estas altiraĵo terura!

Alveninte al la duontubo, je la pli alta finiĝo, la unua, ĉiam forte tenante per la du manoj la tenilon, metis sian ŝovilon sur la lignan supraĵon, kie troviĝas la drapa mureto: La dua malrapide komencas malfermi la sakon. Ili ambaŭ estas videble tremantaj!

“Ĉu vi estas preta, Joĉjo?” demandis li, metante, singarde, la ankoraŭ fermitan buŝon de la sako ĝuste en mezon de la ligna kavvojo; “fortege frapu kaj svenigu<sup>4</sup> ĝin, aŭ mi ne kuraĝos ĝin tuŝi.” “Preta,” respondas la ŝoviltenanto; “jes, tiel preta kiel mi povas esti; tiel preta kiel kiam la morto mem atendas ian mallertaĵon; preta, Viĉjo, vi diras!”

“Ne riproĉu, Joĉjo; vole, nevole, estas necese ĝin fari.”

“Kaj kial ĝi estas necesa? Ĉiunokte ni batas kaj rebatas kaj ankoraŭ rebatas la sovaĝan fiŝbeston. Kial ne restus ĝi en sako? Kiel mi ŝatus<sup>5</sup> ĝin mortigi. Ĉu ĝi estas senmortema, vi pensas?”

“Se ĝi ne estus tiel batata kaj svenigita, ne eble estus ke la Doktoroj ĝin tuŝu; sed post tia frapado ĝi restos morgaŭ preskaŭ kvazaŭ senviva. Kaj estus danĝerege ke ĝi restu en sako. Se ni ne ĉiunokte svenigis ĝin, baldaŭ ĝi rompigus la sakon, kaj tiam, Ho ve la mondo!!! Venas sur nin la vivado de ĉiuj vilaĝanoj, eble eĉ de la tuta homaro. Frapu fortege; jen—”

Singarde kaj malrapide la buŝo de la sako estis malfermita. Io rapida kiel la fulmo antaŭen saltegas, tute rekta al la vizaĝo de lertega Joĉjo.



Unu momenton la drapa mureto haltigas ĝin, kaj en tiu momento Joĉjo antaŭpuŝas la ŝovilon, kaj per rapidega movo forte forĵetas la sovaĝan beston. Kun bruega sono ĝi frapas, dekstre de mia ĉambro, la nerompitan muron, je la alteco de ĉirkaŭ dudek piedoj de la tero. Joĉjo estas aginta kontraŭ ĝi same kiel oni agas kontraŭ la balon kiam oni ludas "Cricket."

Tute svenigita ĝi tombas sur la teron, blanka objekto, plata, kaj laŭ la formo de ŝoleo<sup>6</sup>.

En la momento dum ĝi restas kvazaŭ senviva, Vilĉjo rapidas ĝin levigi kaj remetas ĝin en la sakon, kie, en tre malmulto da sekundoj ĝi rekomencas la antaŭan saltadegon.

De nove la malfermo de la sako; de-nove la antaŭena saltego; de-nove kaj ankoraŭ de-nove.

Kiam Vilĉjo la kvaran fojon malfermas la sakon li subite ekkrias; "Gardu treege, Joĉjo, ke vi ne sendas ĝin tra la fenestroj, ĉar ĝi mortigos kiun ajn ĝi tuŝos."

Tiel forta estas por mi la altireco ke mi tute estas forgesinta la du fenestrojn malfermitajn. Mi rapide kuras al la alia fenestro, ĉar ĝi estas tre proksima je la muro, kaj mi fermas ne sole la fenestron, mi ankaŭ antaŭmetis antaŭ ĝi la lignajn kovrilojn, fortajn kaj, mi kredis, nerompeblajn.

Tion farinte, mi estas fermonta la alian fenestron kiam mi aŭdas ekkriegon de la korto, kaj vidas la beston mem saltantan, aŭ flugantan, en la malfermajon. Du aŭ tri fojojn ĝi ĉirkaŭflugas la tutan ĉambron. Eble ĝi min ne vidas; certe ĝi min ne tuŝas, sed mi sentas la venton de ĝia flugo, kaj kuras kiel eble plej rapide al la pordo.

Kiel eble plej rapide; sed la fiŝbirdo kiu vere flugas, sed flugas per naĝiloj, tiel rapide antaŭen saltis, tien kaj tien ĉi, ke ĝia blanka korpo ŝajnas esti nur strio<sup>7</sup> de lumo.

Mi aŭdas koleran bruon, mi sentas la venton de aero traŝirita, kaj la terura fiŝbesto ĉirkaŭflugadas mian kapon, preskaŭ frotante mian vizaĝon. Mano sur la tenilo de la pordo, mi restas senmove kaj ekpensas. "Estas en la domo virinoj kaj infanoj. Se mi malfermas la pordon, mi permesos al tiu ĉi terura besto eniri en la domon. Mi ne kuraĝas tion fari. Pli bone estus ke mi mortus mem, kaj eble la besto ne vundos min. Mi restos en la ĉambro."

Tial mi foriras de la pordo; kaj, kvazaŭ per ĝia malbona spirito ĝi povas legi miajn pensojn, la fiŝbesto forflugas al la malfermita fenestro, kaj pendigas sin sur la ekstera flanko de la kurtenoj, kiel grandega nokta papilio.

Dume la du viroj kriegadas.

"Forkuru, Sinjoro, se estas eble, sed ne lasu ĝin eniri en la domon, la plej malgranda piko

kaŭzos la morton. Gardu la ponardegon<sup>8</sup>! Mi kaj Vilĉjo supreniros."

Sed timante pri la virinoj kaj infanoj mi ne deziras ke oni malfermu la pordon.

Sur tableto kuŝas larĝa, maldika libro, kaj la fiŝbesto pendas, kiel mi diris, sur la eksteraĵo de la kurteno. Ĝi restas tute senmova, eble ĝi dormas. Mi denove rapidego ekpensas.

"Se mi ĝin frapos forte kaj subite, kredeble ĝi forfalos eksteren en la korton. Tiam, antaŭ ol ĝi povos reveni, mi fermos la fenestron."

Per la du manoj tenante la libron, mi proksimiĝas la kurtenon. Tiam, per rapidega movo, mi frapas la korpon blankan, kiu, laŭ mia espero, estas forpelata tra la malfermaĵo.

Forĵetante la libron, mi ĵetas min sur la malfermitan kadron, kaj komencas fortego ĝin tiri mal-supren. Sed ĝi estas pezega kaj moviĝas nur malrapide; antaŭ ol mi povas ĝin fermi, mi vidas revenante la fiŝbeston, ne nun saltigantan kiel strio de lumo, sed nerapide kaj kviete per movo kvazaŭ ĝi naĝas en aero. Jam trikvaronoj de la vitro estas pasinta la baron de la pli alta kadro. Nun unu kvarono restas de la malfermaĵo, kiam, tutproksime de mia vizaĝo, alvenas la blanka solea korpo; ĝi glitas supren inter la vitro kaj la baro de la pli alta kadro. Mi tiras pli kaj pli forte kaj la kadro pli rapide malsupreniras, sed mi vidas la blankan platan korpon glitantan ĉirkaŭ la malsupreniranta baro, kaj en tiu sama momento la fenestro fermiĝas, kaj la terura fiŝbesto falas sur mian korpon kaj pendigas sin sur la brusto de mia nokta vesto. Mi estas tute enfermita kun la objekto de mia teruro! Senmove ĝi pendigas sed mi sentas tra la maldensa vesto la palpetaĵojn kaj mi vidas la menacajn okulojn, ruĝajn kiel brulantaj karboj. Kiel ŝtono mi staras! Miaj okuloj grandiĝas; mia sango malfluidiĝas; mia koro estas tute haltigita; kaj kiel kanteton, mi aŭdas la frazon, denove kaj denove, "La plej malgranda piko kaŭzas morton." "Vi malfidu la ponardegon." Mi ne kuraĝas eĉ spiri. Pesege la blanka korpo premas mian bruston; brulege la okuloj ruĝaj brulas mian cerbon.

Ekster la pordo mi aŭdas brueton. Joĉjo kaj Vilĉjo do alvenas!

La besto ankaŭ aŭdas la soneton; en la brulaj okuloj mi vidas brileton de kompreneco kaj kruelegeco. La naĝiloj moviĝas, la vosto levigas. Mi antaŭsentas la pikon de la terura ponardego. Mi ne povas plu suferi; mi ne povas plu atendi; per la du manoj mi subite disŝiras la tutan bruston de la vesto, kaj fortego forĵetanta ĝin saltas al la pordo kaj ekkriegante grandegan kriegon de tururo . . . mi vekigiĝis.

<sup>1</sup> Premonition.

<sup>2</sup> To enjoy.

<sup>3</sup> Legs.

<sup>4</sup> A sole.

<sup>5</sup> Burdens.

<sup>6</sup> Streak.

<sup>7</sup> Swoon.

<sup>8</sup> Sting.

Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 6286.]

(Vidu la Novembran kaj Decembran N-rojn.)

## AKTO I.

## SCENO 2 (daŭrigo).

- MIRANDO.— Vi ofte jam al mi ekparoladis  
Pri mia la deven', sed ĉiam haltis,  
Lasante min ankoraŭ nekonantan.
- PROSPERO.— Sed nun la ĝusta horo fine venis,  
La nunminut' postulas ke vi aŭdu.  
Obeu, aŭdu. Ĉu vi ne memoras  
Epokon . . . aliloke ol ĉi tie ? . . .  
Memori vi ne povas, kompreneble,  
Ĉar tiam vi ne estis eĉ trijara !
- MIRANDO.— Sed iometon povas mi . . .
- PROSPERO.— Memori ?  
Pri kio ? pri personoj ? domo ? Nomu  
L'imagon kiu en vi konserviĝis.
- MIRANDO.— Kredeble estas sonĝo malproksima,  
Sed ne memoro, kiun mi posedas . . .  
. . . Ĉu servis min aŭ kvar aŭ  
[kvin virinoj ?
- PROSPERO.— Virinoj multaj servis vin, Mirando !  
Sed, kiel povis tia fakto loĝi  
En via nematura la memoro ?  
Nu ! vi memoras pri antaŭfariĝo . . .  
Ĉu eble kiel vi ĉi tien venis ?
- MIRANDO.— Sed mi ne povas.
- PROSPERO.— Antaŭ dek-du jaroj,  
La patro via, dek-du jaroj antaŭ,  
Regnestro estis, de Milano duko.
- MIRANDO.— Ĉu vi, sinjor', ne estas mia patro ?
- PROSPERO.— Patrino via ĉiam estis virta :  
Ŝi diris ke vi ido mia estas,  
Kaj via patro, duko de Milano,  
Herediton unu sole havas :  
Princino rajte estas ŝi naskita.
- MIRANDO.— Ĉiel' ! per kia perfidaĵ' ni perdis  
Grandecon tian ? Ĉu por nia bona,  
Ĉu malfeliĉa sorto ?
- PROSPERO.— Ambaŭ, kara.  
Perfido nin forpelis el Milano,  
Sed ni benige tien ĉi alvenis.
- MIRANDO.— Ho ! mia kor' sangadas ĉe la penso  
Je la malhelpo kiun mi vin kaŭzis . . .  
—Mi kvankam ne rememorigas tion—  
Bonvolu vi daŭrigi.
- PROSPERO.— Via onklo,—  
—Ke frato povis tiel perfidiĝi !—
- Apud vi, homo, kiun mi koramis  
La plej en mondo—kiu eĉ regadis  
Duklandon mian, tiam la unuan,  
Ĉar estis mi el dukoj la plej alta !  
Precipe fama per indeco mia,  
Mi artamulo brilis senegala ;  
Lernante tempon mi libere uzis,  
Regadon forlasinte al la frato . . .  
De l'lerno l'amo tiel min okupis  
Ke fremda mi fariĝis al la ŝtato.  
Perfida onklo via . . . Ĉu vi aŭdas ?
- MIRANDO.— Sinjoro, tre atente.
- PROSPERO.— Nu, li frue  
Ricevis prince multon da petantoj,  
Rifuzis kelkajn, kelkajn kuragiĝis.  
Kaj malobeon punis. Li renomis.  
Li anstataŭis eĉ sekvantojn miajn,  
Aliformigis ilin ; ĉar li havis  
Ŝlosilon oficejan, ja, la homan,  
Kaj laŭdi lin regnantojn li instruis ;  
Ĉar kiu flatis plej l'orelon lian  
Profiton plej ricevis. Nun li estis  
Hedero princan trunkon vualanta,  
Suĉanta eĉ verdaĵon mian propran !  
—Vi ne aŭskultas . . .
- MIRANDO.— Patro, tre avide !
- PROSPERO.— Atentu, kara ! . . . Mi, konfidemulo,  
Pli ŝtataferoj nun ne plu zorgante,  
Al pliboniĝo de klereco mia  
Dediĉis tempon : la malica frato  
Profitis. Malgraŭ mia grandanimo,  
Solece, mi fariĝis nekonato . . .  
Malbona sento movis Antonion  
Vidantan min senlime lernamulon.  
Konfido mia naskis kulpon lian ;  
Senlima same lia ambicio  
Fariĝis ; ankaŭ la kvieto mia.  
Nu, provizita ne nur je trezoroj  
Sed je la povo eĉ postuli plie—  
—Mensoge ĉiam se agadas homo,  
Memoron sian tiel li pekigas,  
Ke la malveron li jam plu ne sentas—  
Jam Antonio pri si mem ekpensis  
Ke li la duko estas.—Ĉar li agis  
Plenege tiam kiel duklandestro ;  
Privilegion ĉiam li posedis,  
Kaj tial plialtiĝis—Ĉu vi aŭdas ?
- MIRANDO.— Ho ! tian diron aŭdus surdulino !  
(Daŭrigo.)

## KAZABIANKO (Casabianca).—Mrs. Hemans.

Tradukis CLARENCE BICKNELL.

*La juna Kazabianko, knabo dektriaĝa, filo de la Admiralo de la ŝipo "Orient," restis ĉe sia posteno<sup>1</sup> (en la batalo de la Nilo) post la ekflamiĝo de la ŝipo, kaj kiam ĉiuj pafilegoj estis forlasitaj. Kiam la flamoj atingis la pulvon, li pereis pro la eksplodo.*

La knabo sur la ŝip' brulanta,  
De ĉiuj forlasite, staris ;  
La flamoj de l'batalruinoj<sup>2</sup>  
Sur la mortintoj lumon faris.

Sed, naskiĝite por komandi,  
Li restis, brava kaj belega,  
Estaro de heroo sango,  
Infano, sed de form' noblega.

La flamoj proksimiĝis ; tamen,  
Al patra mendo<sup>3</sup> li obeis ;  
Kaj sia voĉo al la patro  
Ne venis, ĉar li jam pereis.

Li laŭte kriis, "Patro mia  
Ĉu mi ne finis devon mian ?"  
Ne sciis li ke l'Admiralo  
Ne povas aŭdi filon sian.

"Parolu, patro," li rediris  
"Ĉu min foriri nun vi lasas ?"  
Sed nur respondas la pafado ;  
La flamoj pli proksime pasas.

<sup>1</sup> Post.    <sup>2</sup> Ruins of the battle.    <sup>3</sup> Order.

Nun sur la fronto lia batas  
Kaj sur la haroj, la varmeco ;  
Sed de l'posteno de la morto,  
Regardis li en trankvileco.

Ankoratŭ laŭte li demandis,  
"Ĉu estos devo, mia halto ?"  
Dum tra la veloj pli kuradas  
La fajroj per rapida salto.

La ŝipon, kun brilec' sovaĝa,  
La flagon<sup>4</sup> ili envolvadis,  
Kaj super la kuraĝa knabo,  
En la ĉielon radiadis.

Subite tondra sku' bruegis  
Sed li—la knabo—kie estis ?  
Demandu de la ventoj kiuj  
La maron per la eroj vestis.

La mastoj, flag', timono<sup>5</sup>—ĉiuj  
Servadon faris je honoro.  
Sed nobla pli ol ili estis  
La juna kaj fidela koro.

<sup>4</sup> Flag.    <sup>5</sup> Helm.

## VESPERO.

I.

Ĉielbrugo,  
Eknoktiĝo,  
Mallumiĝo,  
Malvarmiĝo.

Peza nubo  
Super arbo ;  
Nigra urbo  
Kiel tombo.

Ĉio restas  
Kaj silentas ;  
Ĉio haltas  
Kaj ekmortas.

II.

Senamiĝo,  
Mizeriĝo,  
Forlasiĝo,  
Eksoliĝo.

Malespero  
En la koro ;  
Amvespero  
Sen fervoro.

Koro restas  
Kaj silentas ;  
Amo haltas  
Kaj ekmortas.

CARLO BOURLET.

## KRISTNASKAJ PROBLEMOJ.

*Ĉiuj el niuj Jarabontoj kiuj sendos korektajn solvojn de tiuj ĉi problemoj al la Redaktoro ricevos dekduon da Postkartoj Esperantaj.*

I. Prenu nombran nomon, anstataŭ unu el ĝiaj vokaloj per konsonanto, vi ricevos grandan poeton.

II. Prenu nomon de birdo—1. Duobligu la du unuajn literojn, vi havos bongustan frukton.  
2. Anstataŭ unu konsonanton per alia, vi ricevos kvanton.

III. Prenu nomon de *nematura viro*, kaj tiun de *fortu birdo*. Leĝu ĉiun el ili returnen, vi ricevos.

1. *Financan firmon.*    2. *Inan Rusan baptonomon.*

(Ni presos la solvojn en THE ESPERANTIST, No. 4, kune kun la nomoj de la divenintoj).

(6266).

## ALILANDAJ KUNBATALANTOJ.

Ni ĵus ricevis leteron de Sinjoro Kühnl, la Sekretario de la Esperanta Societo en Bohemujo, kiu revenis de sia longega vojaĝo tra Eŭropo pasiginte kelkajn tagojn en Londono kvankam li tute ne parolis la Anglan lingvon! Li diras. "Hodiaŭ, kiam mi denove sidas ĉe mia skribtablo mi rememorigas tempojn ĵus pasintajn inter miaj novaj sed, mi devas diri, plej amataj amikoj, inter esperantistoj. Tagoj pasintaj en Londono estas al mi des pli agrablaj se mi ekmemoras cirkonstancon sub kiu mi troviĝis en Anglujo, nekonante Vian lingvon. Kaj, kvankam nekonataj homoj, tamen Viaj samlandanoj estis tiel agrablaj je mi, fremdulo. Al Esperanto mi ŝuldas multe, ĉar ĝi ebligis al mi trovi amikojn en fremdlando. Tiun ĉi ŝuldon mi povas vere nur per plej agema kaj viva propagando egaligi. Inter novaj adeptoj mi multe aludos<sup>1</sup> mian veturon en Londonon sen angla lingvo, kaj, por ekflamigi la malmulte vivajn samideanojn, mi decidis publikigi en *Bohema Esperantisto* la tutan vojaĝon.—Kühnl Edward."

Kune kun Sinjoro Kühnl en Londono troviĝis ankaŭ Sinjoro Rene Deshays. Tiu ĉi afabla kaj lerta Esperantisto ankaŭ ne konis nian lingvon. Li skribas. "Kara Sinjoro, Mi tre dankas vin pro la sendo de la nova gazeto esperantista, kiun nia Chaumonta grupo tuj abonis. Via unua numero tute interesis nin kaj estas vere inda je la granda sukceso kiun al vi mi bondeziras. Ĉe mia rekomencita kurso (mi faras ĉi tie la superan kurson) mi prenis por ekzercoj legadaj kaj interparolaj, la ĉarman artikolon pri *L'Itala Somero*. Mi estos ankaŭ feliĉa daŭrigi la legon de *la Ventego Sume*, mi vin kore gratulas pri la ideoj kaj pri la formo. Mia amiko, Sinjoro Mossmann, Sekretario de nia grupo, ankaŭ tre ŝatas vian gazeton, kaj skribis raporton pri ĝi por la ĉitieaj ĵurnaloj.—Réné Deshays."

Plezurege ni povas anonci ke la plimulto da Francaj Grupoj abonis je *The Esperantist*, kaj ni deziras korege danki ilin por la honoro, kaj ankaŭ por la multaj gratulantaj artikoloj kiuj estas presitaj pri ĝi en Francaj Gazetoj.

Trinidado estas malproksima angulo de la mondo, kaj Mayaro estas malproksima angulo de Trinidado; tamen ĝi havas bonan Esperantiston, tiel, kiel la sekvanta interesa letero montros.—"Kara Sinjoro—Estas veturo de kvindek tri mejloj al Port of Spain, tridek per vagonaro, dudek tri per vojo, dek kvin de tiuj ĉi estas nur la malmola

sablo de la marobordo, kiu tie ĉi estas forlasita krom de pelikanoj. La marobordo estas dika je la eternaj kokosujoj<sup>2</sup> kaj la arbetoj de la vinbero de la maro. En Mayaro estas nur kvin blankaj homoj preter mi. Certe estas malĝoje se oni ne estas venkinta la arton sin amuzadi. Sed ni havas belan tropikan marobordon kaj maron similan al la pentraĵoj de la Sudaj Maraĵ Insuloj de R.L. Stevenson. Pentru Londonon, kun ĝia varmeĝo, polvo kaj helo, dum varmega tago de Julio aŭ Aŭgusto, kaj vi havas Port of Spain, tiel, kiel ĝi ĉiam estas. Via. A.M."

Maltaj Samideanoj nun fondis Oficialan Grupon. Doktoro Gustav Busuttil aminde sendis al ni sian paroladon—en Esperanto parolitan—ĉe la kunveno por fondi la Grupon. Belega paroladeto, kaj ni tre bedaŭras ke ni ne havas sufiĉe da spaco por presigi ĝin en THE ESPERANTIST. Parolante pri la kara lingvo mem, Doktoro Busuttil poezie diris—"Esperanto estas kiel nemortema grandega arbo kun multaj fortaj branĉoj, plenaj je ĉiam verdaj Folioj, multekoloraj Floroj, kaj bonegaj Fruktoj. La Internacia Lingvo estas la Arbo: Branĉoj estas la Societoj: Folioj kaj Floroj la Esperantistoj; kaj la Fruktoj estas la Verkoj, la Frata Amo. Nun fariĝi branĉo aŭ resti simpla folio kiun la plej malgranda blovanteta venteto povas faligi—ni devas elekti aŭ unu, aŭ la alian. Kaj kial malakcepti tian privilegion? Antaŭ kvar aŭ kvin monatoj nur estis tri Maltanaj Esperantistoj. Je tiu tempo Sinjoro Agius skribis leteron pri la lingvo al la *Daily Malta Chronicle*. La afero eble silente estus mortinta se la Hon. Sek. de la Esperanta Klubo ne estus sendinta respondon kiu estis varmega propagandilo de Esperanto kaj ekvekigis la dormantetan simpatian kiu vivis en multaj Maltaj Koroj. Mi respondis al tiu ĉi letero kaj decidis fari veran propagandon pri, per, pro, por, Esperanto. Mi esperas ke la helpo de ĉiuj ĉeestantaj gesinjoroj, fortiĝos la Maltan branĉon de la grandega arbo kaj ke ni nutros la saman Esperon." Sendube la sindonema Doktoro Busuttil tro akcentis nian letereton, sed kompreneble Anglujo ĉiam faros tion, kion ŝi povos, por helpi sian fratinsulon fondi fortan Societon. En Maltujo estas gazetoj Anglaj kaj Italaj. Ambaŭ el ili presigis multajn bonajn artikolojn pri Esperanto, kaj oni devas gratuli Sinjorojn Agius, Busuttil kaj Ciantar, kaj esperi ke la potencaj gazetoj presados artikolojn kiel eble plej ofte.

<sup>1</sup> Allude to.

<sup>2</sup> Cocomnut Palms.

## KIAN AGON LA SFINKSO HAVAS?

Sendube la plej antikva konstruaĵo hommana, kiu ankoraŭ restas ĝis nunaj tagoj, estas la granda statuo kiun oni nomas la Sfinkso. Tiu fama statueto staras aŭ—pli bone diri—kuŝas sur la sabloj de la egipta dezerto, apud la Piramidoj de Gizeo, kaj ne malproksime de Kajro, ĉefurbo de Egiptujo. La statueto havas la formon de kuŝanta leono, laŭ korpo kaj membroj; sed kun kapo, ŝultroj kaj brusto de virino. Ĉe nia tempo nur vidigas iom plu ol la kapo de la giganta statuo; ĉar la cetero de la figuro estas kovrita, kaj kvazaŭ enterigita, de la sablo.

Kian agon la Sfinkso havas? Ĉu iu povas tion nun eltrovi? Ĉe la militiro de Napoleono en Egiptujon, oni rakontas ke li admonis siajn soldatojn—“Bravuloj miaj, de la altaĵo de tiuj ĉi Piramidoj, milcentjaroj vin rigardas!” Tion ne estis tute frazo aŭ fanfaronado<sup>1</sup>; modernaj observantoj kaj esploristoj anoncas eĉ pli malproksiman daton. Kaj ĉiuj scienculoj konsentas ke la Sfinkso ekzistis longe antaŭ la fondigo de la Piramido.

Plinio skribis, ĉe sia tempo, ke la leonvirina formo de la Sfinkso memorigas la maksimumon de la jaran Nilan superakvon, kiu okazas ĉirkaŭ la 6a ĝis 16a de Aŭgusto, dum estas la Suno en la signoj zodiakaj Leono kaj Virgulino. Tamen, per sekvo de la fenomeno “procesio de la tagnoktegaloj,” la signoj de la homa sistemo Zodiaka ne akordiĝas tute en loko kun la realaj stelaraj de sama nomo.

La fiktiva<sup>2</sup> (tamen konvena) sistemo homa malproksimiĝas de la reala loko de la stelaraj dum la daŭro de ĉirkaŭ 12,900 jaroj,—kaj tiam vice alproksimiĝas dum egala tempo; kune 25,800 jaroj, en kiu tempdaŭro la Suno transkuras la tutan zodiakon, loĝante en ĉiu zodiaka stelaro laŭ la vico. Tiel, kvankam la superakvo de la Nilo (ĉe tempo de Plinio) okazis dum la suno estis en la signoj Leono kaj Virgulino, la suno estis, efektive, en la stelaraj Kankro kaj Leono. Kaj en tiu ĉi nuna jaro, la Nila superakvo ankoraŭ okazis kiam la suno estis en signoj Leono kaj Virgulino; kvankam, efektive, la suno estis en la stelaraj Dunaskitoj (the Twins) kaj Kankro.

Tre kredinda supozo, do, estas, ke la Sfinkso estis konstruata en epoko kiam vere akordiĝis la fiktivaj signoj kun la realaj stelaraj de sama nomo. Tia monumento dece<sup>3</sup> memorigus tioman notindan kaj raran okazon. Estis ankoraŭ tia okazo preskaŭ 2,000 jaroj A.K., sed la Sfinkso tiam jam estis pli antikva ol ĉiu historio. Eble, do, la Sfinkso memorigas pli fruan okazon, ĉirkaŭ 23,000 jaroj A.K.? Tia konkludo ne devas ŝajni nekredibla; ĉar Herodoto rakontas ke la Egiptoj jam studiis la sciencon de Astronomio dum 40,000 jaroj, kaj la plej novaj serĉadoj en Egiptujo atestas historion kiu povus atingi tian malproksiman daton.

*Originale verkita BEN ELMY.*

<sup>1</sup> Boast. <sup>2</sup> Hypothetical. <sup>3</sup> Fittingly.

## GERMANAJ PROVERBOJ.

1. La infanoj de niaj najbaroj estas ĉiam la plej malbonaj.
  2. “Preskaŭ” neniam mortigis muŝon.
  3. Pli malgrasa la hundo, pli grasa la pulo<sup>1</sup>.
  4. La plej bona spegulo estas malnova amiko.
  5. Dio donas la vinon, sed ne la botelon.
  6. La kuirejo mortigis plimulte da homoj ol la glavo.
  7. Silkokaj veluroestingas la fajron de la kuirejo.
  8. Unu patro subtenas dek filojn pli bone ol dek filoj unu patron.
  9. Kiu unufoje invitis la diablon en sian domon neniam liberiĝos de li.
  10. La legoscienco havas vaksan nazon: oni povas tordi ĝin laŭvole<sup>2</sup>.
- (En la kvara ESPERANTIST troviĝos dek Italaj Proverboj.)

<sup>1</sup> Flea. <sup>2</sup> At will.

## LERTA RESPONDO.

“Se la demando ne estus malĝentila, kiom vin kostas via loĝejo kaj manĝado?”

“Se la demando ne estus malĝentila, mi tuj respondus!”

B.E.

*Maljunulo:* “Vi diris al mi ke vi mortigis leonon en Afriko?”

*Junulo* (Sveligante je fiero): “Jes, kaj senhelpe mi faris ĝin!”

*Maljunulo* (Kritike): “Do neniu vidis vian kuraĝan agon.”

*Junulo:* “Jes, la leono.”

C.W.T.R.

## VERA RAKONTETO.

En Anglujo la Sinjoroj estas ofte ne sufiĉe bonmanieraj; en Italujo ili estas ofte tro komplimentuloj, kiel la sekvanta vera rakonteto atestos.

Du sinjoroj, Milananoj, kiuj renkontis la unuan fojon ĉe vespermanĝo, malfrue kunforiris.

“Ĉu vi iras dekstren?” diris Sinjoro A. “Jes,” respondis Sinjoro B. “Ĉu vi.”

Kaj ili ambaŭ kunpromenis. Ĉe la unua flankstrato ili haltis. Ĉiu kredis ka sia kunvojiranto logis en tiu kvartolo<sup>1</sup>, kaj volis akompani lin domon. Tial ili kuniris antaŭen.

Post multe da similaj haltetoj kiam unu aŭ la alia diris “Mi esperas ke vi ne venis ekster via vojo pro mi,” fine ili alvenis al la enirejo de granda palaco, en kiu loĝas du aŭ tri familioj je ĉiu etaĝo. Sro. A. akceliĝis ion, kaj Sro. B. haltis, konvinkite ke Sro. A. alvenis hejmen. Ambaŭ diris mil komplimentojn kaj “bonan nokton” multfoje kaj “Je nia revido” sed ili kuneniras kaj supreniras al la unua etaĝo, kie ili rehaltis; sed certe neniŭ estis ĉe si: Tial ili supreniris per la dua ŝtuparo k.t.p. ĝis la finiĝo.

Tiam ili trovas ke ili ambaŭ loĝas en alia tre malproksima kvartolo de la urbo!

ESPERANTISTO, 4686.

<sup>1</sup> Quarter.

## LA SONGĜOJ VERIĜIGAJ.

La nigruloj, liberataj servoj en Sudaj Ŝtatoj de Ameriko, estas tre kredemaj, precipe pri ĉarmo. Ili nomas tiujn ĉi “Vudu.”

Foje nigrulo malriĉa kaj mallaborema, iris al maljuna Vudua Doktoro, kaj deziris ke li donu ĉarmon por veriĝigi liajn songojn.

La Doktoro konsentis tion fari kaj donis al li kuniklan osteton kiun li trovis al la tempo de la novluno en la mortintejo. La nigrulo gajege foriris.

Sed post tri aŭ kvar tagoj li revenis tre malplezurata ĉar la ĉarmo ne estis sukcesa.

“Ho! Tiu ĉi ne estas bona,” li diris.

“Ne bona?” ekkriis la Doktoro.

Ne respondis la alia. “Tri foje mi songis ke mi trovus multan monon, kaj hodiaŭ mi *perdis* mian solan moneron! Vi ne estas Vudua Doktoro; tute ne!

“Ha,” respondis la maljunulo. “Ĉu vi ne ofte rimarkis ke vi ne povas memori viajn plej belajn songojn kiam la mateno venis?”

Jes, tiaj kelkafoje estas okazintaj.

“Nu! Oni nur povas veriĝigi tiajn songojn!”

ESPERANTIST, 8379.

## LA FAJFILO DE BENJAMIN FRANKLIN.

Kiam mi estis sepjara infano, en festo oni plenigis miajn poŝojn je kupraj moneroj. Mi tuj iris en butikon,<sup>1</sup> kie oni vendis ludilojn por la infanoj. Sur la vojo mi renkontis knabon, kiu havis fajfilon. Mi estis ĉarmita per ĝia sono, kaj donis por ĝi mian tutan monon. Tiam mi returnis hejmen kaj fajfis ĉie en la domo. Mi estis tre kontenta pri mia fajfilo, sed mi maltrankviligis la tutan familion. Miaj fratoj kaj gekuzoj, sciĝinte pri mia komerco, diris ke mi pagis kvaroblan prezon. Mi ekpensis kiom da bonaj objektoj mi povus aĉeti per la resta mono, kaj ili tiel ridis je mia malsaĝeco, ke mi pro malĝojoj ploris.

Sed tio ĉi estis poste utila por mi. Ofte, kiam mi estis tentata aĉeti nebezonan objekton, mi diris al mi mem “Ne donu tro multe por fajfilo” kaj tiamaniere mi konservis mian monon. Kiam mi fariĝis grandegulo kaj eniris en la Societon, mi renkontis multajn, tre multajn, personojn kiuj

donis tro multe por siaj fajfiloj. Kiam mi vidis viron tro deziregantan la reĝajn favorojn: Kiam mi vidis iun celantan la popularecon kaj nezorgantan pri la propraj aferoj—tiam mi diris “Vere, li tro multe pagas por sia fajfilo.”

Kaj kiam mi vidis avarulon, kiu rifuziĝis je ĉia komforta vivo, tiam mi diris ke ankaŭ li tro pagis sian fajfilon. Kiam mi renkontis plezuramanton, kiu ne zorgis pri ia ajn laŭdinda plibonigo de sia animo aŭ propraĵo, kaj kiu nur klopodis pri korpa ĝuo “Eraranta homo,” mi diris, “vi kaŭzas al vi maltrankvilon anstataŭ plezuro; vi ankaŭ donas tro multe por via fajfilo.” Mallongige, mi komprenis, ke granda parto da homaj malfeliĉoj estas kaŭzata per la falsa taksado pri la prezo de objektoj, ke oni donas tro multe por siaj fajfiloj!

Tradukis KABE.

<sup>1</sup> Shop.

## CORRESPONDENCE NOTES.

DEAR SIR,—A matter which requires the careful attention of those who desire to make themselves perfectly intelligible to all, irrespective of nationality, is the correct use of prepositions. In English the same preposition is often employed to express many diverse ideas, and it therefore becomes desirable to consider this when translating prepositions into Esperanto.

Of course it is often possible to evade the difficulty by using the accusative without a preposition, and one is often tempted to employ the invaluable "je." As, however, this latter practice should not be indulged in too frequently, it may be of interest to many of your readers to consider some phases of our preposition "of."

- (1). The first word of the line.  
*La unua vorto de la linio.*
- (2). One of us will be chosen.  
*Unu el ni estos elektata.*
- (3). Do not think of it.  
*Ne pensu pri ĝi.*
- (4). The best means of obtaining it.  
*La plej bonaj metodoj por ricevi ĝin.*
- (5). The Professor of the school.  
*La Profesoro ĉe la lernejo.*
- (6). A great number of ideas.  
*Granda nombro da ideoj.*
- (7). The largest room of the house.  
*La plej granda ĉambro en la domo.*
- (8). The largest of all the trees in the garden.  
*La plej granda inter ĉiuj la arboj en la ĝardeno.*

When in doubt as to which preposition should be used, try the sentence with all the possible forms, and the correct, logical, preposition will almost always be obvious.

ESPERANTISTO, 8105.

Several friends have called attention to the apparent misprint in the word *Trinki*, thinking it should be *Drinki*. There is, however, an important difference between the two. *Trink'* (as "made in Germany") is used for the ordinary drinking of man and beast; but with shame we admit that our own vocabulary provided Dr. Zamenhof with the *drink'* which represents the excessive tipplings of men and beasts. Let us beware of calling our friends "Drinkuloj" during the dog-days. *Trinkulo* is the more usual and agreeable word.

Having had occasion to write to the Remington firm on a matter of business, a reply was received

in Esperanto, concluding with a question of general interest regarding the sound of "Scii." This word, represented phonetically, does present some difficulty. S-ts-ee-ee is not easy to pronounce. In practice one should elide the first "s" on to the vowel immediately preceding. Thus *mi scias* is pronounced *mis cias*.

The pronunciation of the vowels in Esperanto still seems to give some difficulty, for a correspondent queries the sounds of vowels when followed by "r."

Esperanto is a phonetic language. "One letter, one sound," is one of its invariable rules. Therefore, no matter what the letters adjacent to those vowels may be, their value is invariable. Take the word "per" for example. This is sounded as the English "pay," followed by "r," which is slightly trilled, and not silent, as it often is in English. The writer was once talking in Esperanto with a French expert, and at the termination of the conversation asked if there were any noticeable differences between the English and French methods of pronunciation. "None whatever" was the reply, except perhaps in the value of the letter "r."

Beginners must therefore be careful to sound this letter; and, with regard to the vowels, students cannot dwell too much on them at first. Dr. Lloyd, in his most able article on Esperanto, in the current *Westminster Review*, says that the vowels are neither long nor short, but have a middle value. This is a very happy description of Esperanto vowels as they are spoken, and if beginners are careful to keep them long at first the middle value will assert itself as fluency is attained.

Some of the suffixes are very difficult to define. Many learners have believed that only concrete substances could be represented by the use of the suffix "aj." Such words as *bonaĵoj*, *amikaĵoj*, etc., they would do away with, and replace by *boneco*, *amikeco*, etc. On giving the matter a little thought, however, it is quite clear that there is a distinct difference between *amikaĵoj* and *amikeco*. Whereas the latter means friendship pure and simple, *amikaĵoj* represent the friendly actions which are the outcome of the state of friendship. The nearest English equivalent to define *amikaĵoj* is *friendlinesses*. Similarly *bonaĵoj* are *goodnesses*, or good actions, which necessarily arise from the state of goodness, as represented by the abstract suffix "ec."

## DIVERSAJ SCIIGOJ.

Je Decembro 15 fondiĝis la Tyneside Esperanta Societo, najbaro de la forta grupo de Newcastle. La novenaskita societo jam komencis sian vivon per la laŭdinda energio de Sinjoroj Davidson, Clephan kaj Pearson. La klopodo estis komencita per tre humoraj leteroj pri Esperanto en la lokaj ĵurnaloj, kaj sendube tiuj ĉi varbigis kelkajn el la multenombraj membroj kiuj jam aliĝis je la Grupo. La Hon. Sek. estas Sinjoro Alan Davidson, 26, Park Crescent, North Shields. Ni petas ke ĉiuj *Tyneside* amikoj skribu kaj aligu je li.

\* \* \*

Sendube multaj el niaj legantoj jam vidis la bonegan artikolon en la Decembra *Westminster Review*. Doktoro Lloyd, kiu faras Esperantan kurson ĉe la Liverpola Universitato, bonege scias kiel priskribi la karan lingvon, kaj ni konsilas ke ĉiuj Geesperantistoj legu la artikolon.

\* \* \*

La jaro 1903 vere finigis per fanfarado<sup>1</sup>. La eldono de tri novaj verkoj, la enpreso en gravan Revuon de Esperanta artikolo, kaj la fondo de almenaŭ du novaj grupoj estus estiintaj sufiĉaj por notindigi la pasintan monaton. Sed la Esperantistaro ankaŭ trovis novan kaj taŭgan helpanton. Leŭt. Kolonelo Pollen, C.I.E., LL.D., dufoje paroladis pri Esperanto ĉe *The Imperial Institute*, Londone. La unua fojo estis kunveno de la Angla-Rusa la dua de la Angla-Inda Societo. Ambaŭ el tiuj ĉi paroladoj estis tute sukcesplenaj, kaj sendube varbis multajn novajn rekrutojn. Doktoro Pollen estas tre gajhumora, kaj li amuzis sian aŭdantaron, eĉ kiam li instruis ĝin. Por klarigi la bezonon por internacia lingvo, li rakontis lasekvantan anekdoton. Brita Mara Ofiĉiro manĝis kun Ĥino, kaj deziris duan kvanton de ia bongusta spicaĵo, kies nomon li nesciis. Kredante ke ĝi enhavis anason, li ekkriis al la mastro de la domo, "Kvak, kvak! Kvak Kvak!!" sed la mastro, post iom de tempo, ridetante respondis "Ne, Baŭ-aŭ! Baŭ-aŭ!" kaj Doktoro Pollen asekuris la aŭdantaron ke, se tiu ĉi ofiĉiro kaj sia Ĥina amiko komprenis Esperanton, simila teruraĵo ne povus okazi! Post la parolado, kelkaj el la Indaj ĉeestantoj opiniis ke estis bedaŭrinde ke oni ne uzis la Sanskritan alfabeton kiu, ili diris, estas la plej simpla kaj kompleta en la mondo. Sir G. Birdwood, la Prezidanto de la societo, kontraŭbatalis kontraŭ Esperanto, ĉar li tute neaprobis facilajn lingvojn! Ju pli malfacila,

des pli taŭga por la edukado de la homaro. Sed li konfesis ke la Persa lingvo estis tro malfacila por li!

\* \* \*

Grafo Albert Gallois skribas "Estimata Sinjoro, La Redakcio de *L'Esperantista*, monata organo de la Itala Esperantista Societo, tute estas reorganizita kaj reformita. De nun ĝi estos tute redaktata per itala kaj esperanta lingvoj kaj precize aperos en la fino de ĉiu monato. Fervore ni petas la Esperantistojn de ĉiuj landoj sendi artikolojn, tradukojn kaj sciigojn por kunlabori al la redaktado de la ĵurnalo, *Grafo Albert Gallois*, en Riolunato, Modena, Italujo. La jarabono kostas kvar frankojn."

\* \* \*

La eldono de la lernolibro en la Braila skribo vekigis la blindulojn en nia lando. Dankon al la helpo de Sinjoro Cart, kiu vere estas tre sindonema en tiu ĉi afero, estas espereble ke post mallonga tempo Esperanto vere estos internacia lingvo inter la kompatindaj blinduloj. La Hon. Sek. de la Esperanto Club bedaŭras ke li ne komprenis la Braillean skribon antaŭ ol li komencis klopodi pri Esperanto. Poste li ne havis tempon por ĝin lerni. Ĉar, tago post tago, leteroj en tiu ĉi nekonata lingvo alvenadis, li petis ke Sinjoro W. P. Merrick aminde prenu sur sin la devojn de Hon. Sek. por la Blindaj Esperantistoj. Ni do esperas ke, en la estonteco, oni bonvolu skribi rekte al tiu ĉi afabla helpanto de la Blinduloj, kies adreso estas *The Manor Farm, Shepperton, Middlesex*.

\* \* \*

En alilandaj societoj, ofte troviĝas multaj sekretarioj, por la diversaj partoj de la administracio de la Grupo. Ĝis nun la Esperanto Club nur havis unu. Sed, kvankam la koro deziras ĉion fari, la tempon mankas. Ni do antaŭmetas peton ke oni ĉiam sendu estontajn mendojn<sup>2</sup> je libroj ne al la Hon. Sek. sed al Sinjoro P. H. Howard, *The Librarian, Esperanto Club, The Bungalow, Cranes Park, Surbiton, Surrey*. Kvankam Sinjoro Howard havas sian propran grupon Surbitone li ankaŭ aminde prenis sur sin la devojn de "Librarian," tiel malpezigante la laboron de la Hon. Sek. Tiu ĉi estas necesa por ke Esperanto kaj la Gazeto kreskadu, kaj ni esperas ke ĉiuj amikoj memoros la ŝanĝon kaj tiel ŝparos laboron kaj tempon.

<sup>1</sup> Flourish of trumpets.<sup>2</sup> Orders.



*In order that this Gazette may be useful as a propaganda agent, it has been considered advisable to include in each number a synopsis of the Grammar of Esperanto, so that those hitherto ignorant of its system may be the better able to appreciate the magazine.*

## SYNOPSIS OF THE GRAMMAR.

The ALPHABET is composed of 28 letters. They are the following:—

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U V Z and Ŭ.

The VOWELS are always given a long sound; as in the well-known phrase, "Pa, may we go too?" Shorthand students will at once recognise them as the long vowels of "Pitman." Their sound can also be illustrated by—"Bart, Bait, Beat, Boat and Boot."

The following CONSONANTS need special attention. It must be remembered that the sounds given are invariable, because *Esperanto spelling is phonetic and each letter has only one sound*:—

|            |   |                  |                         |   |
|------------|---|------------------|-------------------------|---|
| The letter | C | is sounded as in | Czar, or as the "ts" in | Bits.   |
| "          | Ĉ | "                | "                       | Church.   |
| "          | G | "                | "                       | Gag; <i>i.e.</i> , the hard sound.                              |
| "          | Ĝ | "                | "                       | George; <i>i.e.</i> , the soft sound.                           |
| "          | H | "                | "                       | His; <i>i.e.</i> , it is aspirated and never mute as in French. |
| "          | Ĥ | "                | "                       | Loch; <i>i.e.</i> , the Scotch or German "CH" or Spanish "J."   |
| "          | J | "                | "                       | the English letter Y. Thus Paroloj is sounded Paroloy.          |
| "          | Ĵ | "                | "                       | the French J in Bijou or the S in the English word Pleasure.    |
| "          | S | "                | "                       | in Sun; never as in Rose (Rozo in Esperanto).                   |
| "          | Ŝ | "                | "                       | in She.   |

The English letters Q, W, X and Y do not exist in Esperanto.

The letter Ŭ is only found in diphthongs—Baldaŭ is sounded Bahldow.

The one remaining point to be mentioned is that "AJ" is the same as in By. "OJ" as in Boy.

ALL NOUNS end in O in the nominative singular. Birdo, a bird.

When the direct object to a verb, an N is added to this O. Mi havas birdon, I have a bird.

All nouns form the PLURAL by adding J to the singular. Birdoj, birds. If objective, birdojn.

All ADJECTIVES end in A and agree with the noun in number and case. Mi havas belajn birdojn, I have beautiful birds.

The INFINITIVES of VERBS always end in I. Lerni, to learn. Pensi, to think.

PRESENT INDICATIVES end in AS in all persons singular and plural. Mi iras, I go. Ili iras, they go.

PAST INDICATIVES end in IS in all persons singular and plural. Mi iris, I went. Ni iris, we went.

FUTURE INDICATIVES end in OS in all persons singular and plural. Ŝi iros, she will go.

CONDITIONAL MOOD ends in US in all persons singular and plural. Li irus, he would go.

IMPERATIVE MOOD ends in U. Parolu! speak! Iru! go!

SUBJUNCTIVES are formed by using "KE" and the Imperative. Ke mi iru, that I might go.

The PRESENT PARTICIPLE ACTIVE ends in ANTA—Iranta, going. In the Passive voice in ATA—Farata, being done.

PAST PARTICIPLE ACTIVE ends in INTA—Irinta, having gone. In the Passive voice in ITA—Farita, having been done.

FUTURE PARTICIPLE ACTIVE ends in ONTA—Ironta, about to go. In the Passive voice in OTA—Farota, about to be done.

ADVERBS end in E—Bone, well. Bele, beautifully.

1. The DEFINITE ARTICLE is invariably LA in all cases singular and plural. La Patroj, the Fathers.

2. There is no indefinite article in Esperanto. Patro, a Father; or merely Father, as the case may be.

3. "NOT" is expressed by "NE." Mi ne havas amikon, I have not a friend.

4. Questions are introduced by "Ĉu." Ĉu mi ne havas amikon? Have I not a friend?

5. ESTI, to be, is the auxiliary verb in Esperanto. Havi, to have, is never an auxiliary.

N.B.—There are no exceptions or irregularities in Esperanto.

The VOCABULARY has been simplified by about 30 affixes, which are used to modify the meanings of root words. The commonest are the following PREFIXES :—

BO indicates relationship by marriage. Bofrato, Brother-in-law.

DIS indicates separation, as in English. Dissiri, to tear to pieces.

EK indicates the commencement of an action. Eklerni, to begin to learn.

MAL is always used to indicate OPPOSITES. Varma, warm. Malvarma, cool. Amiko, friend. Malamiko, enemy.

RE denotes the repetition of an action. Relerni, to relearn. Rediri, to say again.

The principal SUFFIXES are the following :—

AĴ signifies an object made from—thus, Fruktajo, something made from fruit.

AR signifies a collection of. Arbo, a tree. Arbaro, a forest.

EBL signifies possibility. Videble, visibly. Lernebla, learnable.

EC signifies an abstract quality. Boneco, goodness. Beleco, beauty.

EG signifies increase. It is the augmentative suffix. Granda, large. Grandega, immense.

EJ signifies the place where an action takes place. Lernejo, school. Preĝejo, church.

ET is the diminutive suffix. Infaneto, a little child. Varmeta, lukewarm.

IG denotes the causing of an action. Morti, to die. Mortigi, to kill.

IĜ denotes turning or becoming. Paliĝi, to turn pale. Fortiĝi, to become strong.

IL denotes the instrument by which an action is performed. Kudri, to sew. Kudrilo, a needle.

IN denotes the feminine. Patro, father. Patrino, mother. Onklo, uncle. Onkino, aunt.

IST denotes the occupation, or means of livelihood. Botisto, bootmaker. Servisto, manservant.

UL denotes the possession of a Quality or Attribute. Blindulo, a blind man. Danculo, a dancing man.

By means of these affixes, the Vocabulary is enormously simplified.

All should have "The Student's Complete Text Book," 1s. 8d., post free, and "Thirty-five Exercises," 1s. 3d., in order to thoroughly learn the system; but the above is serviceable as a rough basis.

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Librarian, P. Howard, Esq., The Bungalow, Cranes Park, Surbiton, Surrey.

The books most read are :—

"Student's Complete Textbook," by J. C. O'Connor, B.A., 1s. 8d., post free (revised edition).

"Thirty-five Exercises with Keys," by A. Motteau, 1s. 3d., post free (6 copies for 6s. 6d.).

"No. 52," a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d.

Fundamenta Krestomatio; Dr. Zamenhof, 3s.

"Hamlet," translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Stories from back "L'Espérantistes," 2d. each.

"Tourist's Phrase-Book," in 6 languages, 6d.

Esperanta Sintakso de P. Fruictier, 1s. 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are :—

"La Lingvo Internacia," printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

"L'Espérantiste," in French and Esperanto, 4s.

"La Lumo," in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Belga Sonorilo," in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Bohema Esperantisto," in Czech and Esperanto, 3s.

"La Rondiranto," in Bulgarian and Esperanto, 3s.

The new "Internacia Medicina Revuo" will appear every two months. Subscription 6s. 6d. per annum.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries, 2s. 6d. each.

"French-Esperanto Vocabulaire," 2s. 6d.;

"Esperanto-French Dictionnaire," 1s. 6d.

"Braille Instruction-Book for the Blind," 4s.

Translation of the above into English, 6d.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.

No. 4.

THE

February, 1904.

# ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the spreading  
of the International Language.

Edited by **THE BELLINGBROKE MIND.**

ANNUAL SUBSCRIPTION; 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Published by **THE LONDON ESPERANTO CLUB**, 41, Outer Temple, London, W.C.

## CONTENTS.

|   | Price |
|---|-------|
| PRESIDENT'S REPORT AT AKBADIA<br>MEXICO: . . . . .  | 40-50 |
| DR. ZIMMERMAN'S REPLY TO PROLOGUES 51   |       |
| HOW TO WRITE A QUOTE (H. W. Clephan) 53-57  |       |
| NEW YEAR'S FEEL (Clarence Bennett) 51   |       |
| CLAU (Casp. Ivanovich Elshin) . . . . .   | 58    |
| THE TRIPPER, continued from page 5,<br>21 & 47 (translated by A. Mottoni) 56                    |       |
| YOUR OWN FRIEND . . . . .   | 57    |
| DR. ZIMMERMAN'S VIEWS ON AN ACADEMY 58-9  |       |
| HEAVY CLIMAX FROM HORVATH'S PIZZINI'S<br>1 <sup>st</sup> revised edition by Joseph Rhodes 60-61 |       |
| CONCISEST INDEX 62  |       |
| VARIOUS FORMS OF INDEXES 63   |       |
| FORMS OF INDEXES . . . . .  | 64    |
| ESPERANTO'S HOME LIFE 65-66   |       |

FOR FREE PARTICULARS write to  
the **HON. SECRETARIES** of  
**ESPERANTO SOCIETIES** at

|   |
|---|
| <b>BOURNEMOUTH</b> , I. F. H. Woodward, Esq.,<br>Newport St. Swinton's Road.  |
| <b>DUBLIN</b> , C. Brennan, Esq.,<br>Celtic Association, St. Stephen's Green. |
| <b>EDINBURGH</b> , Miss Twissell, M.A.,<br>9, Princes Street.                 |
| <b>GLASGOW</b> , J. Hunter, Esq.,<br>138, Darnley Street, Dalkeithside.       |
| <b>HODDERSFIELD</b> , G. B. Taylor, Esq.,<br>19, Gladly Hall Road.            |
| <b>KENTHLEY</b> , J. Ellis, Esq.,<br>Compton Buildings, Bow Street.           |
| <b>LONDON</b> , H. Bellingbrooke M.D.,<br>41, Outer Temple, W.C.              |
| <b>NEWCASTLE</b> , H. W. Chapman, Esq.,<br>2, Dalziel Terrace, Gateshead.     |
| <b>PLYMOUTH</b> , J. A. Tall, Esq.,<br>6, Eastern Crescent, Mountbatten.      |
| <b>PORTSMOUTH</b> , Dr. Greenwood,<br>97, St. George's Square.                |
| <b>SURBITON</b> , E. Howard, Esq.,<br>The Langhams, Green Park.               |
| <b>TYNEMOUTH</b> , Alan P. Davidson, Esq.,<br>26, Mack Crosson, N. Shields.   |

It should be distinctly noted that contributors who are willing  
to have their names and communications with the Club, being  
anonymous letters, will not be set in the printer's hands, then to  
be printed.

# The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!

THE INTERNATIONAL MACHINE.

Disputed by the *idea* of nationality:  
The common bond of nations of all civilized peoples.

The Remington can be repaired *wherever* you  
are.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
109, Broadway, St. Louis, Mo.

# La Remington

LA UNIVERSALA ESKRIBMAŝINO.

Pripensu je ĝi!

LA INTERNACIA MAŝINO.

Tute *liberigita* de naciaj limoj -  
La *komuna* unuaĵo por ĉiuj civilizitaj popoloj.

La Remington-maŝino *ĉie* estas *reparata*.  
Ĝi *ĉie* estas *reparata*.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
109 Broadway St. London, E.C.

## To Interest Your Friends,

Send 2/6 to the Librarian, E. HOWARD, Esq.,  
The Bungalow, Cranes Park, Surbiton, for 5  
copies of No. 12. These can subsequently be  
returned with 1/3 extra, and exchanged for The  
Complete Text Book if desired.

## LINGVO INTERNACIA.

A Monthly Gazette entirely in Esperanto. Edited by  
M. Paul Pyschke.

Annual Subscription 3/6. With Library Supplement 5/6.

Send to the Librarian, Esperanto Club,  
Wingfield House, 12.

# The Dictionaries Are Ready.

ENGLISH-ESPERANTO,  
By J. W. BOURNE, B.A. & G. F. HAYES,  
Esq. 1/6.

ESPERANTO-ENGLISH,  
By G. MOYRAH, Esq. 1/6.

These and all other books can be had from the  
Librarian—

E. H. HOWARD, Esq.,  
The Bungalow, Cranes Park, Surbiton.

# "The Playgoer."

THE LEADING THEATRICAL MAGAZINE.  
ILLUSTRATED EVERY NUMBER.

An Up-to-date Artistic Record of  
everything connected with  
the Theatre.

THE ORGAN OF THE NATIONAL PLAYGOER.

SIXPENCE, MONTHLY.

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAGOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
CANADA.—A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal.  
FRANCE.—M. Paul Fruitier, Boulevard Arago 27, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Myba, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—G. B. Smith, Esq., 19, Wiborg Quay, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.  
TRINIDAD.—Geo. O. Messerly, Esq., Port of Spain.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtsignon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

No. 4.

FEBRUARO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

Ĉe Essex Hall, je Jan. 14, laŭ la anonco en THE ESPERANTIST, la Membroj kaj Amikoj de la London Esperanto Club jarkunvenis. Kaj sekve la raporto de tiu ĉi kunveno postulas multe da spaco. Por ke aliaj interesajoj ne estu limigitaj, la kutimita Gramatiketo estas forigita. Mi esperas ke la legataro aprobos tiun ĉi. La Prezidanto de la Klubo, Sinjoro Felix Moscheles, malfermis la kunsidon per longan kaj interesan Esperantan paroladon. Li diris:—

ESTIMATAJ GESINJOROJ,

La unuaj vortoj, kiujn mi diras je tiu ĉi unua Jarkunveno, sendube devas esti parolataj en la lingvo kreita de nia glora majstro, Doktoro Zamenhof. Kaj la unua penso, kiu sin prezentas al mi, estas la tre feliĉa, ke ni povas nin gratuli pri la sukcesoj, kiujn ni gajnis. Sed la ĝojo, kiun mi nun sentas, ne devas silentigi la duan penson, kiu memorigas al ni ĉion, kion ni ankoraŭ devas fari. Ni devas, kaj ni devas longatempe, jes, dum longaj jaroj, bataladi kontraŭ la antaŭjuĝoj enradikitaj en multaj el niaj samlandanoj, kaj ni ankoraŭ devas batali kontraŭ la malhelpanta nescieco de tiuj, kiuj ĝis nun ne estas aŭdintaj la voĉon de nia kara lingvo.

La maniero, je kiu niaj kontraŭuloj traktas niajn penadojn, memorigas al mi la historion de ia Germana deputato, kiu, interrompante la paroladon de la ministro, ekkriis "Mi ne scias viajn argumentojn, sed mi tute malaprobas ilin." Tiel ankaŭ estas la taktiko de tiuj, kiuj ĉiam provadas malhelpi la progreson de la mondo, kaj kiuj precipe malvolas je nia kara Esperanto. "Ni ne konas vian lingvon," ekkriadas tiuj ĉi, "sed ni ĝin tute malaprobas." Nu, tiaj blindaj kritikistoj

At Essex Hall, on Jan. 14, as announced in THE ESPERANTIST, the members and friends of the London Esperanto Club held their annual meeting. And consequently the report of this meeting demands much space. In order that other interesting matter should not be limited, the usual short grammar is left out. I hope readers will approve of this. The Club's President, Felix Moscheles, Esq., opened the meeting by a long and interesting speech in Esperanto. He said:—

LADIES AND GENTLEMEN,

The first words I say in this first annual meeting must, undoubtedly, be spoken in the language created by our illustrious master, Doctor Zamenhof. And the first thought which occurs to me is the most happy one that we may congratulate ourselves on the successes which we have gained. But the joy I now feel must not silence the second thought which reminds us of everything which we still have to do. We must, and for a long time, yes, for long years, keep on fighting against the rooted prejudices of many of our fellow-countrymen, and we also have to contend against the obstructing ignorance of those who, till now, have not heard the voice of our prized language.

The manner in which our opponents treat our efforts calls to mind the tale of a certain German deputy who, interrupting the speech of the Minister, cried out, "I do not know your arguments, but I thoroughly disapprove of them." So also are the tactics of those who continually endeavour to hinder the world's progress, and who bear an especial ill-will against our valued Esperanto. "We do not know your language," these are ever proclaiming, "but we thoroughly

ne povas maltrankviligi nin. Nia devizo estas "Antaŭen," kaj tiu ĉi alia eldiro de la glora Galileo: "E pur si muove." Kaj nun ni nature demandas kial ni, membroj de la Londono Klubo Esperanta povas antaŭvidi je la estonteco kun tiom da konfido. Ni ne similas al tiu deputato; ni serĉas la kaŭzojn kaj ni pesas la argumentojn de la aferoj. "Feliĉulo tiu," diris Virgilo, "kiu povis sciigi la kaŭzojn de la aferoj."

Kial ni povas esti konfidemaj pri la kreskado kaj prosperado de nia Klubo? Tial ke ĝi tiel bonege sukcesis dum la unua jaro de sia estado, ni devas demandi kial ĝi tiel sukcesis. Jen la respondo je tiu demando. Ĝi sukcesis, ĉar ĝiaj Membroj estas per fervoro plenigataj kaj pretaj por sencese labori pro la propagando de la lingvo. Ni posedas inter nia membraro multajn Geesperantistojn, kiuj nin multege helpis, instruante Esperanton senpage, farante kursojn en diversaj kvartaloj de Londono, de Anglujo kaj eĉ eble de la tuta mondo; ĉar multaj el niaj membroj estas anoj de malproksimaj landoj. Ni estas konfidemaj, ĉar ni havas Sekretarion (la sekvantaj frazoj la Redaktoro estas devigita pro la modesteco elstreki, ĉar li ankaŭ estas la Hon. Sek.).

Miaparte, mi kredeble estas la sola kulpinda membro de la Klubo, ĉar mi nur faris pro ĝi la ordinaran ĉintagan propagandon. Tamen, mi ĝojas atesti, ke ne malofte mi sukcesis varbi rekrutojn por nia Afero inter la nekreduloj. Neniu povas sin interesigi pli ol mi pri la celo de nia Klubo. De mia infaneco—nuntempe tre malproksima tempo—mi elserĉadis la rimedojn por interkonigi la diversajn naciojn de la mondo kaj kunligi ilin, anstataŭ malamigi, mortigi ilin. La plej potenca ilo por forigi la mallumon, kiu nin ĉirkaŭas, la ĉiampova instrumento por kunligi la diversajn naciojn de la mondo, estas *La Lingvo Internacia*.

Ne forgesu, do, karaj gesamideanoj kaj geamikoj, ke, laborante pro la lingvo internacia, ni klopodas por benita kaj sankta celo; ni laboras por la feliĉeco de estontaj generacioj, kaj por la plibonigo de la civilizita mondo.

Tuj post la fino de tiu ĉi interesa parolado, la Viceprezidanto, Sinjoro J. C. O'Connor, legis leteron de la Kasisto, Sinjoro W. T. Stead, kiu malfeliĉe ne povis ĉeesti pro malsaneto. Sinjoro O'Connor ankaŭ diris malmultajn vortojn en la Angla lingvo pri la rapida progreso, kiun Esperanto faris inter ni.

Tiam la Hon. Sekretario legis Raporton pri la Klubaj aferoj, kiu estos sendata al ĉiuj Membroj.

disapprove of it!" Now, blind critics of that sort cannot disconcert us. Our motto is "Forwards," and this other saying of the glorious Galileo: "And nevertheless it moves." And now we naturally ask why we, Members of the London Esperanto Club, can look into the future with so much confidence. We do not resemble that deputy; we seek for the causes and weigh the arguments of things. "Happy that man," says Virgil, "who has been able to discover the causes of things."

Why may we be confident as to the continued growth and prosperity of our Club? Since it has succeeded so very well during the first year of its existence, we must ask why it has thus succeeded. Here is the answer to that question. It has succeeded because its members are filled with fervour, and are ready to labour ceaselessly to spread the language. We possess among our members many Esperantists who have very greatly helped us in teaching Esperanto without charge, in holding classes in various parts of London, of England, and even of the whole world; for many of our members are inhabitants of distant lands. We are confident because we have a Secretary (the sentences following the Editor is compelled by modesty to delete, as he is also the Hon. Sec.).

I, for my part, believe I am the only blamable member of the Club, as I have only assisted it by the ordinary daily propaganda. Nevertheless, I rejoice to state that not infrequently have I succeeded in enrolling recruits for our Cause from among the incredulous. Nobody can interest himself more than I about the purpose of our Club. From my childhood—now a very remote period—I have continually been seeking out means for making the various nations of the earth acquainted with one another, and to cause them to unite instead of hating and killing each other. The most powerful means for dispelling the darkness which surrounds us, the ever-powerful instrument for uniting the various nations of the earth, is *the International Language*.

Do not forget, then, dear fellow-thinkers and friends, that, in working for the cause of the international language, we are devoting ourselves to a blessed and a holy aim; we are striving for the happiness of future generations, and for the amelioration of the civilised world.

At the termination of this interesting speech the Vice-President, J. C. O'Connor, Esq., read a letter from the Treasurer, W. T. Stead, Esq., who was not able to be present on account of a slight illness. Mr. O'Connor also said a few words in English on the rapid progress Esperanto has made amongst us.

Then the Hon. Secretary read a Report of the Club's affairs, which will be sent to all Members.

Fraŭlino Lawrence tiam donis al ni du interesajn leterojn. Unu estis de Sinjoro Geoghegan, en Alaska, por kiu, bedaŭre, spaco mankas. La alia estis de Doktoro Zamenhof, reakcentigante la fakton ke, se presistoj ne havas la akcentojn sur la literoj en Esperanto, ili ĉiam povos anstataŭi la akcentojn per la litero "H" (chi, ghi, jhus, ehho, shi) kaj ke la akcento sur "Ŭ" ne devas esti presata. Tiu ĉi oble helpos nian aferon.

La Membraro de kelkaj aliaj Societoj, kiuj deziris kunligi sin kun ni, estis aldonita al la Londona Klubo Esperanta; kaj la oficiala parto de la kunveno finiĝis per fanfarado, ĉar nia kara Estro, Doktoro Zamenhof mem, sendis al ni paroladon per fonografo.

La uzo de fonografoj certe estas gravega ilo por la lernado de la elparolado de Esperanto, kaj tiuj, kiuj havas ilin, estos saĝaj, se ili aĉetos Esperantajn cilindrojn. Sinjoro Rees, de la Modern Language Press, 13 Paternoster Row, London, afable venis por pruvi al ni tiun ĉi fakton, per la cilindro de Doktoro Zamenhof, kaj alia el THE ESPERANTIST. La paroladon kiun Doktoro Zamenhof sendis tiel afablege al ni, mi jam estis kopiinta, antaŭ ol la transkribo alvenis. Tiu ĉi fakto pruvos al skeptikuloj, ke la paroloj de nia Estro Varsovie tute estis Londone kompreneblaj al ni.

#### ESTIMATAJ SINJORINOJ KAJ SINJOROJ,

Ne havante la eblon partopreni persone en la unua jarkunveno de la Londona Klubo Esperanta, mi sendas per fonografo mian koran saluton al ĉiuj partoprenantoj en la kunveno. En mia imago mi prezentas al mi, ke mi sidas nun ĵinter Vi, estimataj Anglaj amikoj de la ideo de lingvo internacia, kaj mi ĝojas kune kun Vi pro la belaj fruktoj, kiujn Via energia laborado donis en la daŭro de la foririnta jaro. Antaŭ unu jaro nia afero estis ankoraŭ tre malmulte konata en Via lando, kaj nun ni havas en Via lando jam tre multe da varmegaj kaj sinceraj amikoj; ni havas diversajn klubojn de Esperantistoj, ni havas konstantajn kursojn de Esperanto, ni havas belan gazeton Esperantan. Preskaŭ ĉio estas la frukto de laborado de la Klubo Londona, kiu povas esti fiera je la rezultato de sia unuajara penado. Al la noblaj kaj energiaj kondukantoj kaj laborantoj de la Londona Klubo Esperanta nia afero ŝuldas koran dankon.

Parolante pri la sukcesoj de la Klubo Londona mi ne devas forgesi pri tiu malgranda rondeto Esperantista en Keighley, kiu metis la komencon por nia afero en Anglujo. Nian koran saluton al la Esperantistoj Kihlianoj!

La laboradon de la Londona Klubo Esperanta la tuta mondo observas kun grandega intereso. Ni ĉiuj esperas kaj antaŭsentas ke, pli aŭ malpli frue, Londono fariĝos unu el la plej gravaj centroj

Miss Lawrence then gave us two interesting letters. One was from Mr. Geoghegan, in Alaska, for which, unfortunately, we have not space. The other was from Dr. Zamenhof, once more accentuating the fact that, if printers have not the accents over Esperanto letters, they may always substitute the accents by the letter "H" (ch, gh, hh, sh, jh), and that the accent over the "Ŭ" need not be printed. This will, possibly, help our Cause.

The Members of some other Societies, who wished to unite with us, were added to the London Esperanto Club; and the official part of the meeting terminated with a flourish, for our dear Chief, Dr. Zamenhof himself, had sent us a speech on the phonograph.

The use of phonographs is certainly an important means of studying the pronunciation of Esperanto, and those who have access to them will be wise in getting Esperanto records. Mr. Rees, of the Modern Language Press, 13, Paternoster Row, London, kindly came to prove this fact by means of Dr. Zamenhof's record, and another one from THE ESPERANTIST. I had already copied the speech which Dr. Zamenhof thus kindly sent before the transcript arrived. This fact will prove to sceptical people that our Chief's words in Warsaw were quite intelligible to us in London.

#### ESTEEMED LADIES AND GENTLEMEN,

Not having the power of participating in person in the first annual meeting of the London Esperanto Club, I send by phonograph my hearty greeting to all participants in the meeting. In my imagination I picture to myself that I now sit with you, esteemed English friends to the idea of an international language, and I rejoice with you at the fine fruits which your energetic continuous labour has given in the course of the past year. One year ago our Cause was still but little known in your land, and now we already have in your land very many most warm and sincere friends; we have various Esperanto groups, we have permanent Esperanto classes, we have a beautiful Esperanto Gazette. Almost all this is the fruit of the labour of the London Club, which may be proud of the result of its first year's endeavours. To the noble and energetic conductors and workers of the London Esperanto Club our Cause owes most hearty thanks.

In speaking of the successes of the London Club I must not forget that little Esperantist circle in Keighley, which gave a start to our movement in England. Our hearty greeting to the Keighley Esperantists.

The entire world observes with very great interest the work of the London Esperanto Club. We all hope and anticipate that, sooner or later, London will become one of the most important

de nia afero por la tuta mondo. Londono longe dormis; sed kiam ĝi vekigis, tio ĉi estos kiel vekigo de leono. Potenca voko iros el Londono kaj ĉiam pli kaj pli sonados kaj resonados en ĉiuj partoj de la mondo. Kun atento la popoloj aŭskultados la voĉon venantan el la potenca centro de la angle-parolantaj regionoj. Kiam pri frateco de popoloj kaj pri neŭtraleco de internaciaj rilatoj ekparolos tia potenca popolo kiel la angla, la mondo aplaudos kun entuziasmo, kaj tiu sankta afero, por kiu ni batalas ekmarŝos rapidege. Esperantistoj en Londono, Esperantistoj en Anglujo, laboru kuraĝe kaj energie. Malfacila, tre malfacila, estas la semado, sed dolĉaj kaj benitaj estos la fruktoj. Granda kaj grava estas Via rolo. La tuta mondo Esperantista rigardas Vin kaj multe de Vi esperaa.

Tiu ĉi parolado treege plaĉis al la aŭdintaro, kiuj korege dankis la Doktoron pro lia aminda saluto. Sinjoro Motteau kun tri aliaj bonege kantis lian belan himnon "Espero" (presita je la dek-sesa paĝo de THE ESPERANTIST), kaj ĉiuj entuziasme kunkantis la ĥoraĵon. Post multaj paroladetoj kaj bela poemeto, kiun elparolis Fraŭlino Schäfer, la kunveno finiĝis, kaj ĉiuj el la partoprenintoj revenis hejmen pripensantaj kiel helpi la kreskadon de Esperanto en Anglujo, kaj tra la tuta mondo.

centres of our Cause for the whole world. London has for a long time slept; but when it awakens it will be as the awakening of a lion. A mighty voice will issue forth from London, and will sound and resound in all parts of the earth. The nations will listen with attention to the voice issuing from the centre of the English-speaking world. When such a powerful nation as the English begins speaking of the brotherhood of nations and the neutrality of international relations, the world will applaud with enthusiasm, and that sacred Cause for which we contend will march forward with great strides. Esperantists in London, Esperantists in England, work courageously and energetically. Difficult, very difficult, is the sowing, but sweet and blessed will be the fruits. Great and important is your rôle. The whole Esperantist world watches you and hopes much from you.

This speech greatly pleased the audience, who most heartily thanked the Doctor for his kind greeting. Mr. Motteau, with three others, sang most effectively his beautiful hymn "Espero" (printed on the page 16 of THE ESPERANTIST), and all joined in the chorus with enthusiasm. After many short speeches and a pretty poem recited by Miss Schäfer, the meeting came to an end, and all the participants returned home thinking how to help the spread of Esperanto in England, and throughout the world.

## KIEL FONDI ESPERANTAN GRUPON.

La fondigo de Esperanta Grupo, por ke ĝi havu bonsukceson, postulas multe da kapableco de organizado, entuziasmon senliman, grandan paciencon, kaj firman decidon ke la grupo prosperos, malgraŭ la malfacilaĵoj, kiuj staras en ĝia vojo.

Sendube la kreado de tia societo aŭ grupo kaŭzos al vi amason da laborojn, kiun ĉiu ajn krom entuziasmulo prave povus nomi sklaveco, Kalkulante la korespondadon, la verkadon de artikoloj, kaj la faradon de ĉio, kion ni povas por gajni la atenton de la skeptikema Publika, plie la varbadon de aliaj samideanoj por ricevi ilian kunhelpon, la laboro vere estas senfina. Sed aliparte, la rezultatoj de viaj penoj estos rekompenco multe pli granda ol sia kosto, ĉar, interalie, oni konatiĝas kun multaj interesaj personoj, ĉeestas ĉe multaj instruantaj priparoladoj, kursoj, k.t.p., kaj, krom tio, ĝuados nombron da aliaj profitaĵoj, kiun bone valorigas la laboradon elspezitan.

## HOW TO FOUND AN ESPERANTO GROUP.

The founding of an Esperanto Group, so that it should be successful, demands much organising ability, boundless enthusiasm, great patience, and firm determination that the group shall prosper, in spite of the difficulties which stand in its path.

Undoubtedly the creation of such a society or group will cause you an amount of work which anyone other than an enthusiast would justly name slavery. In reckoning up the correspondence, the writing of articles, and the accomplishing of everything we can do to gain the attention of the sceptical public, besides the enrolling of other adherents in order to gain their coöperation, the work is truly endless. But, on the other hand, the results of your trouble are recompense far greater than the cost, for, among other things, one becomes acquainted with many interesting persons, is present at many edifying lectures, classes, etc., and, besides this, one enjoys a number of other advantages which are well worth the labour expended.



Kompreneble, oni apenaŭ bezonas diri, ke viaj klopodoj tute ne finiĝos tiam, kiam vi estos fondinta la grupon. Efektive, ili nur ĵus komenciĝis.

Oni ĉiam trovos en nova movado kiel Esperanto, multe da personoj, kiuj volonte alprenos ĝin dum daŭras la intereso ordinaro elvokita de novaĵo ia; sed tuj kiam ĝi ĉesas esti priparolata, ili kviete lasas ĝin subfali. Pri tiaj membroj oni devos precipe zorgi; se iu el ili forlasos ĉeesti la kursojn aŭ saĝnos perdi sian intereson je la afero, skribu mallongan leteron aŭ aliru viziti lin, por certigi lin, ke la Grupo bezonas lian kunhelpon.

Nu, rilate al la maniero laŭ kiu mi volus agadi por fondi grupon.

Unue, estas la Publika Gazetaro, institucio, kies gravaj utilaĵoj por tia movado kiel tiu-ĉi, estas absolute necesegaj. Ĝi liveros al ni la solan efektivan ilon por disvastigi Esperanton inter la ĝenerala publiko. Mi konsilas personajn paroladojn kun Redaktoroj, la plimulto el kiuj jam interesigas sin je lingvaj aferoj, kaj mi kredas, ke vi renkontos nenian malfacilaĵon priparoladi Esperanton kun ili, kaj ricevi ilian subtenpromeson fine. Artikoloj donantaj skizon pri la movado de ĝia komenciĝo, ankaŭ ekzemploj, por montri ĝian utilecon komercie, literature kaj sociale, devos esti prezentataj. Kiel eble plej ofte korespondado por-kaj-kontraŭa, devas esti iniciatata.

Nun tiam kiam, nia afero reale ekmovas en tiu ĉi lando (pardonu min se mi kaptas la nunan okazon por diri kiel mirinda, laŭ mia opinio, estas la progreso, kiun ĝi jam faris, kiam oni konsideras ke apenaŭ pasis dekdu monatoj de ĝia komenciĝo), mi estas certa, ke troviĝos multaj Esperantistoj de diversaj partoj de Britujo, kiuj tre volonte donos sian subtenon al la afero, skribante leterojn en la Gazetaro pro la fono de ia ajn Klubo, Grupo, au Societo. Tia korespondado sendube pruvos, ke ekzistas multe da kontraŭuloj al nia ideo. Tio-ĉi estas neevitebla por ia nova movado, kaj iliaj kontraŭdiraĵoj devas esti ĝentile aŭskultataj, kaj lerte rebatitaj de iu el ni, kiu posedas la necesan kapablecon por tia laboro. Ni ĉiam memoru, ke tia kontraŭeco pli multe valoras por ni ol apatio kaj indiferenteco.

Elvokinte dum kelke da tempo, intereson pri la afero, kaj tiel kaŭzis ian parton de la publiko iĝi dezireman eklerni pli da ĝi, faru publikan paroladon pri la temo de Helpanta Lingvo Internacia. La Prezidanto devas esti loka eminentulo ia.

Anoncoj de la kunveno devos enpresigi en la

Of course it is hardly necessary to say that your great exertions certainly do not cease when you have founded the group. In fact, they have only just commenced.

One will always find in a new movement like Esperanto many persons who will willingly take it up while the interest lasts, which is generally aroused by any novelty; but, as soon as it ceases to be talked about, they quietly let it drop. Of such members one must take especial care; should any one of them discontinue attending the classes or seem to lose interest in the subject, write a short letter or pay him a call to assure him that the group needs his coöperation.

Now, as regards the *modus operandi* for founding a group.

In the first place, there is the Public Press, an institution whose uses in such a movement as this are absolutely essential. It will give us the only effectual means for spreading Esperanto among the general public. I advise personal interviews with Editors, the majority of whom are already interested in matters linguistic, and I believe you will not encounter any difficulty in discussing Esperanto with them, and in finally obtaining their promise of support. Articles giving a sketch of the movement from its commencement, also examples for illustrating its uses for commerce, literature, and society must be submitted. As often as possible correspondence *pro and con* should be initiated.

Now that our cause really begins to move in this land, (excuse me if I take the present opportunity to say how remarkable, in my opinion, is the progress it has already made when one considers that scarcely twelve months have passed since its commencement), I am certain that many Esperantists will be found in various parts of Britain who most willingly will give their support to the movement by writing letters to the Press in favour of the foundation of any Club, Group, or Society. Such correspondence will doubtless prove that there exist many opponents to our proposal. This is inevitable in any new scheme, and their adverse comments must be politely listened to, and instructively refuted by any of us who possess the necessary capability for such work. Let us ever bear in mind that this opposition is to us of far greater worth than apathy and indifference.

Having aroused, for a time, interest in the subject, and thus having caused a certain section of the public to become desirous of learning more about it, give a public lecture on the theme of an Auxiliary International language. The Chairman should be someone of local eminence.

Announcements of the meeting must be printed

lokan Gazetaron. Ankaŭ estos bone, ke vi petegu la apogon de la diversaj Institucioj Literaturaj de la lokaĵo, kaj, aranĝinte la kunvenon, alsendu al ĉiu Sekretario, por dissemado inter la membroj, cirkuleretojn sciigantaj ĝian daton, lokon kaj celon.

Je la finiĝo de la parolado, invitu disputadon, kaj tuj anoncu la fondon de la nova Grupo (nature, la regularo, proponoj, k.t.p., devas esti antaŭe formulitaj), decidu pri la titolo de la Grupo, difinu ĝian celon, kaj elektu la registaro, k.t.p. Tion farinte petu al viaj aŭdantoj, ke ili tuj fariĝu membroj.

La abonpago devos esti tiel malgranda, ke ĝi ne fariĝu baro por malhelpi ies ajn aliĝon.

Ĉi tiuj estas la ĉefaj principoj, laŭ kiuj mi ekfondis la Societon, kies Hon. Sekretario mi estas; kompreneble ne sen havinte la valoran kunhelpon de la aliaj membroj (el kiuj konsistas la nuna Komitato), kaj ankaŭ tiun de la nelacigebla Hon. Sekretario de la Esperanto Klubo, la Redaktoro de tiu ĉi Gazeto.

Mi kore esperas, ke tiuj ĉi malmultaj rimarkoj utilis al samideanoj, kaj ke ili estu kuraĝigitaj por fondi Grupojn en tiaj regionoj, kie neniam nun troviĝas.

in the local Press. It would also be well to seek the support of the various Literary Institutions of the neighbourhood, and, having arranged the meeting, to send to every Secretary, for distribution to the members, bills announcing its date, place, and purpose.

At the termination of the lecture invite discussion, and then and there announce the foundation of the new Group (obviously the rules, proposals, etc., must be drawn up beforehand), fix the title of the Group, define its purpose, and elect its officers, etc. This done, ask your audience to at once become members.

The subscription must be so small as to form no obstacle to anyone's joining.

These are the chief principles by which I have founded the Society whose Hon. Secretary I am, but certainly not without having had the valuable co-operation of the other members (of whom the present Committee is composed), and also that of the indefatigable Hon. Secretary of the Esperanto Club, the Editor of this Gazette.

I sincerely hope that these few remarks will be useful to Friends-in-Esperanto, and that they will be encouraged to found Groups in those localities where none at present exist.

H. W. CLEPHAN.

## LA NOVA JARO 1904.

Originale verkita de CLARENCE BICKNELL, Kun Angla traduko.

Ĉu la Jar' Nova povus esti  
Sen kruco aŭ doloro ?  
Sen tim' pro ia perd' malĝoja  
En tre proksima horo ?

A year without a sorrow  
Or a cross,  
Or dread of any morrow  
Bringing loss. Could it be ?

Ĉu estos ĝi de brila lumo  
Sen unu ombr' malbona ?  
Ĉu estos kampoj floroplenaj,  
Kaj ĉiu flor' fruktdona ?

A year of light, with shadow  
Scarcely one ?  
Of fruits in every meadow,  
Thistles none. Will it be ?

Sen dornoj estu la rozujoj  
Sed rozoj plimultiĝu !  
Pli bona ol komenco sia  
La Nova Jar' finiĝu !

A year of many roses  
And few thorns ;  
A year that brighter closes  
Than it dawns. May it be !

Almenaŭ ĝi deviĝos porti  
Progreson al la tero,  
Ĉar DI' al ni vidaĵojn novajn  
Donacos de la Vero.

A year of God's unfolding  
Wider wings ;  
A year of man's beholding  
Better things. Must it be !

## O J E .

RUSA SKIZO, Originale Verkita

de OSIP IVANOVIČ ELLEDER.

Melankolia aŭtuna nebulo disvastiĝis super la ĉirkaŭaĵo. Malgaja malsupreniganta Novembra nebulo. Griza en griza aperigas ĉio. Grizaj nuboj tiradas tien malalte sur la ĉielo, preskaŭ kun manoj preneblaj. Kiel nigraj dikaj buloj sidas korvoj sur pintoj de nudaj senfoliigitaj arboj, ĉie kaj tie malrapide, mallaŭte ekflugante. Multaj grandaj akvogutoj de la matena nebulo pendigas sur la branĉoj malsupreniĝinte ilin: larmoj de naturo postplorantaj al la pasintaj belaj somertagoj. Malĝojeco en la naturo, Malgajeco en homa koro.

El la budo, sur la korto, sonadas laŭtega hundbojado. Jam de frua mateno ĝi sonadas. La granda nigra hundo bojas. Li bojas ĉar li sopiriĝas je sia bela ordonantino, kiun li pli frue ĉiam kaj ĉie akompanadis, sed nun oni lin alĉenigis kaj li ne povante al sia amanta, ĉarma ordonantino kuri, bojas. Li senĉese estis bojanta, malgaje—.

La ĉarmega fraŭlino, ordonantino de Oje amis tiun hundon bojantan, kiu ŝin pli frue, kiam ŝi estis en la vilaĝo vizitanta sian fratinton, akompanis ĉiam kaj ĉie; sed nun ne estis tio eble! Ho! kiel alie tiam sonadis lia bojado, kiel ĝoje, hele, sed nun—

Ŝi iris al la budo. La hundo saltadis antaŭen al ŝi, sed la ĉeno tiris lin ree malantaŭen, li ŝiris fortike je la ĉeno, sed ĝi estas pli forta ol li kaj ne lasas lin. La juna fraŭlino paŝis al Oje kaj elteniĝinte sian malgrandan blankan maneton, ŝi karesadis lin. La hundo frenezigiĝis de ĝojo. Li estis granda rusa ĉashundo, malbela sed fidelega. Kun siaj mallumaj saĝaj hundokuloj li prudente rigardadis la belajn okulojn de sia ordonantino kaj, silentiĝinte, kvieteme li premis sian nigran kapon je ŝia vestaĵo.

Rimarkinde! La okuloj de Oje havis similecon kun ŝiaj okuloj. Ne en la koloro, ŝiaj estis grizablauaj, liaj brunaj, sed la esprimo en ili estas egala. Rimarkinda simileco!

Sur la korto reĝis nun silentado, sed ne por longe. La bela fraŭlino foriris kaj Oje ree malgaje bojadis.—Post kelkaj tagoj la bojado de Oje enuigis la belan fraŭlinon kaj, ĉar li ne ĉesis, restante ĉiam alĉenigita ŝi, prenite belan pezon de rostita viando kaj irinte al la budo, ĵetis ĝin tien, dirante “Havu, manĝu kaj kvietigu!” Ŝi eldiris tion malkare, malmole kaj foriris sen ia kutima amema vorto, sen kareso. Hodiaŭ ŝi estis iom ĉagrenita, la bela fraŭlino.

Malgaje postrigardis Oje sian amantan malproksimiĝantan ordonantinon. Malgaje li ekbojis kaj kaŝiĝis en la budon. Alĵetitan viandon li ne mangis.

En la sekvanta nokto frostiĝis kaj falis iom da neĝo. Matene reĝadis tutega silentado sur la korto.

La servistino forirante vespere vidis ke, antaŭ la budo, kuŝas la nigra Oje sur la neĝo entendata, senmove. Proksimiĝinte ŝi vidis ke li estas mortinta. Antaŭ li kuŝis la bela peco de rostita viando.

“Ho, Dio estu laŭdata,” diris la servistino, “li pli ne maltrankviligos la domon”: kaj ŝi rapidis alkomuniki tiun bonan novaĵon al la aliaj domloĝantoj.

“Eble li mortis pro malsato,” kompatinde diris la administrantino.

“Ho, ne!” respondis la servistino, “kuŝas ankoraŭ apud li la granda peco de viando kiun nia fraŭlino hieraŭ ĵetis al li.”

“Ah, nia fraŭlino, ni devas do al ŝi tuj alkomuniki tiun aferon, rimarkis la maljunulino “ŝi amis Ojen, kvankam mi vidis ke ŝi hieraŭ estis al li malkara; spite tion ŝi amis lin, mi scias. Iru, Nellie, kaj diru al ŝi ke Oje mortiĝis; ŝi estas en ruĝa ĉambro. Mi nun estas okupata, ĉar morgaŭ mi havas grandan lavadon.”

—Nellie foriris al la ordonantino—

Vesperstelo jam aperigiĝis. Ekstere fariĝis klare, froste. La plena luno hele allumigis ĉiujn objektojn sur la korto, kie nun estis senvivo, funebro.—Ĉe la fenestro de ruĝa ĉambro, apoginte sin al la kadro, staris tiatempe silente, senmove la juna virina figuro. La vizaĵo forte alpremigita je la vitro, ŝi rigardadis eksteren. Jam longe ŝi staris tiel enprofundiĝinta en pensoj. Ŝiaj rigardoj estis dirigita al unu punkto sur la korto. Rigide eltendita kuŝis tie antaŭ sia loĝejo Oje, la mortinta rusa ĉashundo. Akre, klare desegniĝis la konturoj de la senviva korpo sur la blanka neĝplato. Liaj large malfermigita brunaj okuloj ŝajnis rigardadi alten al la fenestro de sia amanta ordonantino. Li kuŝis tie kvazaŭ en la morto ankoraŭ gardante ŝin.

Longe rigardadis la juna virino senmove, senlaŭte, al sia fidela mortinta akompaninto.

Kion ŝi pensadis? Ĉu ŝi pensis pri Oje, kiel en pasintaj belaj somertagoj fidele li akompanadis ŝin, je ŝiaj promenadoj? Aŭ ĉu ŝi bedaŭris siajn lastajn malmolajn vortojn? Kiu povas tion scii? Eble ŝi tute ne pensis pri la senviva hundo, eble ŝi en tiu momento kalkulis kiamaniere ŝi aliros alian. Kiu povas scii tion? Kompatinda Oje!—

Sed nun trafis la argenta lunradio sian vizaĵon kaj eklumigis du multepezajn larmojn. Du grandaj perloj briliĝis en la belegaj grizablauaj okuloj.—“Feliĉa Oje” gentile ŝi sopiris. “Fidela en la vivo, fidela ankoraŭ en la morto” mallaŭte parolis la lipoj de la juna fraŭlino en ruĝa ĉambro.—“FELIĈEGA OJE.”—

En la nokto falinta neĝo molekovradislian korpon.

[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 6206.]

(Vidu la tri antaŭajn Nrojn.)

## AKTO I.

## SCENO 2 (daŭrigo).

- PROSPERO.—De mi plu li ne vidis vualitan  
La rolon kiun ludis Antonio—  
Min rigardante kiel malsagulon,  
Kaj reĝon sole de mizeraj libroj—  
Li absolute duko sin anoncis!  
Avida tiel estis li je povo  
Ke li konsentis al la reĝ' Alonzo  
Duklandon fari depagantan jare,  
Submetis dukan al la reĝa trono,  
Milanan kapon altan li klinigis . . .  
Duklando, ĝis li, ĉiam liberama!  
Ve! Kia mallevaĵo!
- MIRANDO.— Diaj povoj!  
PROSPERO.—Konduton lian notu, al mi diru  
Ĉu frate kun mi agis via onklo—  
MIRANDO.—Mi pekis se ne noble mi ekpensus  
Pri la avino mia—sed, patrinoj  
Bonegaj naskis tre malbonajn filojn.  
PROSPERO.—L'enradikita malamiko mia,  
Alonzo tuj aprobis la proponon  
Per kiu, por la submetiĝo landa  
Kaj jara pago de dukatoj multaj,  
Forpelus Antonio min kaj miajn  
El la duklando, kiun de la reĝo,  
Kun multaj ĝojaj, luksaj gratulegoj,  
Akceptis nun perfida mia frato.  
Soldatojn estis li subaĉetinta,  
Pordegojn li malfermis en la nokto . . .  
Envenis bando, kiu, tra l'mallumo,  
Forportis min, kaj ankaŭ vin ĝemantan,  
Rapide el Milano!
- MIRANDO.— Ho ve, patro!  
Tiamajn plorojn mi ne plu memoras,  
Sed la pripensoj min devigas plori.  
PROSPERO.—Aŭskultu, tamen plie, ĝis mi venos  
Al nuna la afero—ĉar sen tio  
Ne taŭgus la rakonto.  
MIRANDO.— Kial ili  
Tuj ne mortigis nin?  
PROSPERO.— Demando prava,  
—El la rakonto rajte postulata—  
Pro l'amo de l'popolo al Prospero  
Ne faris ili sangavidan krimon:  
Perfidon tiel ili belsajnigis  
Ke ĝi blindigis ĉiun Milananon.  
En barko nin elsendis ili maren,  
Sed, kiam la marmezon ni atingis,  
Nin ili jetis en pruantan ŝipon
- Senmastan, senŝnuraĵan, forlasitan  
Eĉ de la ratoj.—Ho ve! malfeliĉaj!  
Ni ekkriadis al la marondegoj,  
Ekgemis ni al la ĝemantaj ventoj . . .  
Koncerto stranga, sed ne simpatia!
- MIRANDO.—Ĉielo! kia mi malhelpo estis!  
PROSPERO.—Ho, ne! fariĝis vi kerubo vera,  
Traplenigita de l'ĉiela beno;  
Rideto via min revivigadis!  
Mi maron kiam faris pli salitan  
Per el la koro tiel akraj ploroj,  
Vi kuragiĝis min kaj fortigadis  
Por kontraŭstari eblan mizeregon!
- MIRANDO.—Sed kiel ni el ŝipo landon trafis?  
PROSPERO.—Per Dia helpo, kara!—Jes; nutraĵon  
Ni havis—kiun reĝa konsilano  
Gonzalo—elektita de Alonzo  
Por tiel nin elpeli—al ni donis.  
Ĉiele inspirita bonfarinto!  
Li plie riĉajn vestojn, ŝtofojn, silkojn  
Aldonis—pli eĉ ol mi diri povas!  
Objektojn, kiujn ĝis nun ni uzadis,  
Utilajn kaj bonegajn. Ĉar li sciis  
Ke estas mi precipe libramulo,  
Eltiris li el la biblioteko—  
De mi ŝatita pli ol la Duklando—  
Amatajn librojn, kaj al mi alportis.
- MIRANDO.—Ĉielo volu tiun homon beni!  
Mi tre dezirus vidi lin!  
PROSPERO (*Remetas la mantelon*).— Mirando,  
Aŭskultu de l'prakonto la finiĝon.  
Ĉi tien sur insulon ni alvenis,  
Ĉi tie mi mem, edukisto via,  
Instruis vin pli zorge ol principon  
Ĝuantan vane multajn liberhorojn,  
Aŭ gubernistojn ne zorgamajn tiel.
- MIRANDO.—Ĉielo rekompencu vin!—Nu, patro,  
Mi petas, diru kial vi ĵus kaŭzis  
Tielan marventegon.  
PROSPERO.— Nu! sciigu  
Ke tien ĉi, hodiaŭ, per okazo  
Feliĉa, kvankam stranga, ĵus alvenis  
La malamikoj miaj. Nun dependas  
Zenito mia de favora stelo,  
Influan kies devas mi fidele  
Akcepti—aŭ neniam releviĝi—  
Demandoj ĉesu! Vi nun dormi volas—  
Kontraŭbatali tion vi ne povos—  
Filino, ĝin obeu! (*Mirando ekdormas*).  
(*Daŭrigota*).

## ALILANDAJ KUNBATALANTOJ.

Estas bedaŭrinde ke, ĝis la nuna tempo, Germanujo ne estas estinta grava helpanto al nia afero. Estas do pli ol ordinara plezuro lerni, ke Grupo fondiĝis en la ĉefurbo de tiu lando. La "Berlina Esperantista Grupo" espereble fariĝos centro de multaj estontaj societoj, kaj ĉiuj Germanaj Samideanoj devas skribi al unu el la membroj de ĝia estraro. La Hon. Sekretario estas Sinjoro J. Borel, Prinzenstrasse, 95, Berlin.

Ankaŭ estas plezurege fari anoncon pri alia grupfondiĝo, en pli malproksima regiono. Ni ĉiuj bone scias ke Meksikujo estas tre riĉa lando, sed nur antaŭ kelkaj tagoj ĝi aldonis la karan Esperanton al siaj aliaj trezoroj. La Gazeto *El Minero Mexicano* enpresis tutan paĝon pri la fondo de tiu ĉi plej juna grupo, en la Hispana kaj Esperanta lingvoj, kaj kompreneble tiu ĉi apogo de tia grava ĵurnalo multe helpas niajn novajn kunbatalantojn.

La Sekretario estas Doktoro A. Vargas, kiu plezure donos pluajn sciigojn pri ĝi. Ĉar multaj gesamideanoj estas dirintaj, ke Esperanto pli similas je la Hispana ol je alia ajn lingvo, mi presigis kelkajn liniojn el tiu ĉi anonco en la lingvo de Cervantes. Ĉu Esperantistoj, kiuj ne konas la Hispanan lingvon, povos ĝin kompreni?

"Esta dificultad no existe con el Esperanto, que se presenta humildemente, no para destronar los idiomas existentes, sino como intermediario entre todas las naciones."

Sed, nunatemp, troviĝas pli de Esperantistoj, kiuj parolas la lingvon de Dante, ol tiun de Cervantes, kaj, eble, frazo en la Itala lingvo ankaŭ estos komprenebla por tiuj el miaj legantoj, kiuj tute ne komprenas tiun ĉi belan sudan lingvon. Ni legu eliraĵon el "*Malta*," skribita de la tiea sindonema Sinjoro Dominic Ciantar. "L'Esperanto non mira neanche ad abbattere alcuna delle lingue; al contrario esso promette di servire come chiave per acquistarle. I libri che trattano sullo studio dell' Esperanto sono oramai tradotti in diciotto lingue."

Mi esperas, ke la legantaro pardonos tiun ĉi enpreson de lingvo alia ol la helpo internacia, sed ili estas enkondukitaj, ĉar estus interese ekscii, kiun el tiuj ĉi du lingvoj pli similas je Esperanto.

Kaj sendube la malmultaj vortoj en la Itala lingvo tre plaĉos al niaj fervoraj Maltaj Gesamideanoj. Sciigo pri la fondo de forta Malta grupo (72 membroj) aperis en la Januaro ESPERANTIST.

Lia Moŝto Napoleone Tagliaferro, Estro de la Malta Edukafako estas la Prezidanto de tiu ĉi Societo, kaj Doktoro C. Sammut, Profeso de la Universitato, estas Vic-Prezidanto. Plie, je la tago de la Nova Jaro, la Redaktoro de tiu ĉi Gazeto ricevis tre afablan leteron, kiu sciigis lin pri lia elektigo kiel Hon. Prezidanto de la Grupo.

Kvankam li multe klopodadis pri la naskiĝo de la Grupo, li tute ne atendis tian honoron. Tamen, esperante ke li povu multe helpi siajn tieajn amikojn dum la estonteco, li dankeme akceptis la honoron, kaj deziras per la kolonoj de THE ESPERANTIST sendi sian koran dankesprimon. Kompreneble la Estro de la Grupo estas Doktoro Zamenhof mem, kiu afable sendis sian gratulon kun la espero ke Maltujo rapide antaŭmarŝos ĝis la pordoj de akordado internacia.

Sinjoro Jonko Davidov sendis la sekvantan leteron:—

"ESTIMATA SINJORO,

"Mi faris sukcesindan paroladon pri Esperanto en la salono de la Silistra (Bulgarujo) instruista lernejo antaŭ ĉiuj lernantoj instruistoj, kun permeso de la Direktoro. Post la parolado mi malfermis senpagan kurson pri Esperanto en la sama lernejo antaŭ 32 instruistoj, estontaj disvastigistoj de Esperanto. La kurso iras sukcesplene."

Sinjoro Davidov estas Sekretario de la Silistra Esperanta Klubo, kaj sendube tiu ĉi kurso tre helpas la aferon en Bulgarujo, kie jam troviĝas multe da samideanoj.

Bedaŭrinde, la spaco mankas por la enpresado de la alia letero, kiun tiu ĉi sinjoro afable estas sendinta, kaj kiu proponis organizon inter la diversaj grupoj Esperantistaj. Sed la longa letero de Doktoro Zamenhof jam traktis pri tiu ĉi afero.

En la komenciĝo de Januaro aperos la unua numero de la *Juna Esperantisto*, revuo por gejunuloj redaktata tute en Esperanto. Ĝi eliros ĉiudumonte (6 numeroj en jaro) po almenaŭ 16 paĝoj aŭtografie presataj. Ĝia abonkosto estas du frankoj (1/9), kaj la Redaktoro estas Sinjoro Hector Hodler, 9, Avenue des Vollandes, Geneva, Switzerland.

La Redaktoro deziras danki la multenombrajn amikojn, kiuj afable estas sendintaj artikolojn por estontaj ekzempleroj de THE ESPERANTIST. Malŝate estas tute neeble tiu respondi pri la taŭgeco kaj presebleco de tiuj ĉi artikoloj, kaj li esperas, ke amikoj pardonos la neeviteblajn malrapidojn.

## DR. ZAMENHOF PRI AKADEMIO.

COURTRAI (BELGUJO), 12<sup>an</sup> DE JANUARO.

Al la Redaktoro de THE ESPERANTIST.

KARA SINJORO REDAKTORO,

En la lasta numero de via tre estiminda ĵurnalo, vi konsentis publikigi proponon kiun mi, kune kun Sro. Ch. Lambert (pri tio via ĵurnalo nekorekte raportis), sendis al vi pri kunveno de Esperantista Kongreso kaj ebla priparolado, tiu-okaze, de la demando pri Akademio. Petinte nian tre karan Majstron, Dron. Zamenhof, ke li konigu sian opinion, mi ricevis la jenan gravegan leteron:

"KARA SINJORO,—Vian ideon pri la aranĝo de internacia kongreso de Esperantistoj mi trovas tute bona. Sed por ke tia kongreso donu al nia afero ne malutilon sed nur utilon, ĝi devas esti aranĝita laŭ la sekvantaj principoj:

1. Ĝi devas esti bone kaj zorge aranĝita, havi multe da partoprenantoj kaj havi la karakteron de granda, solena kaj imponanta *fest*o de internacia frateco, por ke la gazetoj de la tuta mondo multe parolu pri ĝi kaj por ke ĝi estu plena de entuziasmo kaj veku en la tuta mondo entuziasmon kaj deziron aliĝi al ni. Krom paroloj oni devas aranĝi komunajn kantojn en Esperanto, eble eĉ ian internacian ludon aŭ publikan konkurson; oni devas aranĝi en ia granda teatro prezentadon de dramo en Esperanto. Oni devas antaŭe eksciti la interesigon de la tuta urbo, por ke al ĉiuj festoj de la kongreso venu grandega multo da gastoj ne-Esperantistoj;—per unu vorto, oni devas fari grandan *impreson* kaj devigi la tutan mondon paroli pri la kongreso.

2. En la kongreso oni devas paroli pri organizado de nia afero, reciproka helpo en la batalado, pri rimedoj de propagando, pri kreado de granda kaj utila literaturo, k.t.p.; sed *nenion*, absolute nenion oni devas paroli pri iaj *ŝanĝoj* aŭ '*plibonigoj*!' Por ke nia lingvo atingu sian celon kaj ne disfalu kiel Volapük, ĝi devas resti por ni absolute *netuŝebla*, tiel same kiel ĉiu alia lingvo, en kiu nenia persono ja kuraĝas proponi iajn reformojn, kvankam ĉiu el tiuj lingvoj estas multe malpli perfekta ol nia.

Nun al la demando pri Akademio. Jam tre longe mi pensas pri aranĝo de ia konstanta 'Centra Komitato' kiu prezentus per si la plej altan aŭtoritaton en nia afero kaj kiu sola havus la rajton solvadi ĉiujn dubojn kiuj aperas en nia afero. Sed tia komitato devos decidadi nur pri demandoj *dubaj*; fari iajn *ŝanĝojn* en la lingvo la komitato *ne* havos la rajton. Kun la aranĝo de tia Centra Komitato oni devas esti tre singarda,

por ne fari ian danĝeran paŝon; tial mi nur publike ankoraŭ nenion parolas pri tio ĉi, sed mi konsiliĝados pri ĝi private kun diversaj amikoj. Kiam la plano post matura pripensado montriĝos bona, tiam mi publike proponos al la Esperantistoj efektiviĝi tiun planon.

Sed ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne—tiu ĉi demando tute ne devas maltrankviligi niajn amikojn. Ĉiaj paroloj pri reformoj aŭ plibonigoj tute ne devas Vin maltrankviligi, ĉar ili havas nenian celon nek estontecon. Ĉu centra komitato estos fondita aŭ ne—unu principo staras kaj devas stari tute forte, kaj la tuta mondo Esperantista en la nuna tempo komprenas ĝin tre bone kaj certe batalos unuanime kontraŭ ĉiu ektaŭso de tiu principo; tiu ĉi principo estas: *Simile al ĉiu alia lingvo Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo FORMITA kaj NKTUŜEBLA*. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam kiam nia lingvo estos jam *oficiale akceptita* de la tuta mondo. Ĝis tiu tempo la netuŝebleco de la lingvo estas la *plej fundamenta* kondiĉo por nia progresado.

Mi parolas tion ĉi ne kiel *aŭtoro* de la lingvo, sed kiel *simpla esperantisto*, kiu ne deziras ke nia afero disfalu kiel la afero de Volapük. Kiel aŭtoro de la lingvo, mi pli ol ĉiu alia volus ke ĝi estu kiel eble plej perfekta; por mi la retenigado de plibonigoj estas pli malfacila ol por ĉiu alia; kaj mi eĉ konfesas ke kelkajn fojojn mi jam estis preta proponi al la Esperantistoj kelkajn malgrandajn plibonigojn, sed ĝustatempe mi ekmemoradis pri la granda danĝereco de tia paŝo kaj mi forĵetadis mian intencon.

Mia opinio ne estas sekreta. Se Vi deziras, Vi povas publikigi mian leteron.

Via

(Subskribite) ZAMENHOF."

Antaŭ ĉiö, mi deziras tre danki publike nian karan Majstron. Konsentante konigi sian opinion ne nur pri Kongreso kaj Akademio sed ankoraŭ pri la "reformoj" de Esperanto, li certe grandege utilis al nia afero. Poste mi deziras, ĉar kelkaj Esperantistoj neĝuste komprenis miajn intencojn, publike certigi ke, proponante kunvenon de Kongreso kaj priparoladon pri Akademio, mi\* nur celis prepari kaj naski la rimedojn por kontraŭbatali efike la danĝerojn kiuj nune minacas nian aferon. Mi esperis ke de la Kongreso

\* Oni volu rimarki ke tia estas mia propra, tute persona opinio.

devenus ia aŭtoritato (ĉu ekzistas ia pli dezirinda ol tiu de la genia kreinto de Esperanto?), ia aŭtoritato kiu povus *precipe* gardi kaj konservi nedifektita, for de ĉia ajn "plibonigo," nian karan lingvon kaj, tiele, ĝin konduki al la triumfo.

Tial mi estas tre feliĉa ĉar Dro. Zamenhof tiel lertege difinis la programon kiun plenumos tiu organizaĵo kaj ĉar li tiel energie protestis kontraŭ la rolo *reformada* kiun kelkaj Esperantistoj deziris altrudi al ĝi. De nun do ne plu estas necese disputadi pri Akademio: ni konfideme atendu la tagon kiam ĝin efektigos Dro. Zamenhof. Kaj, ĝis tiu tago, ni unuanime konsideru la aŭtoron de Esperanto kiel *nian solan aŭtoritaton*: ni petu pri liaj konsiloj por solvi niajn dubojn kaj *ni uzu nenium novan vorton ne aprobitan de li*.

La energia letero de Dro. Zamenhof mirinde forigos ĉiun mallumon, ĉiun dubon kaj montras al la Esperantistoj la erarigan kaj allogantan vojon de la malsukceso sed ankaŭ tiun de la triumfo.

Ĉiuj Esperantistoj, Esperantistoj grupoj kaj ĵurnaloj nun densiĝu ĉirkaŭ nia kara Majstro, ili tre konvinkiĝu pri la vereco de liaj paroloj kaj neniam forgesu ke *nur per la unueco de la lingvo kaj la unuigo de la koroj ni ricevos la venkon!*

Volu akcepti, Kara Sinjoro Redaktoro, mian plej koran saluton.

MAURICE SEYNAEVE,

Belgujo.

N.B.—La Redaktoro deziras korege 'dankŭ Doktoron Zamenhof pro la sendo de tiu ĉi letero. Estas tute necese ke ĉiuj amikoj de la lingvo-internacia kunlaboru pro la dezirata celo harmonie, kaj akcepti la lingvon tiel kiel ĝi nun estas. La kolonojn de THE ESPERANTIST ne estas malfermiĝitaj por la enpresado de "plibonigo" ia, al la nuna tempo, ĉar, sub le estreco de Doktoro Zamenhof la afero jam estas bonege progresinta kaj la lingvo plaĉas al ĉiulandanoj. Nuntempe Esperanto enhavas unu grandan malfacilaĵon kiu multe malhelpas ĝian universalan alprenon: La akcentoj sur la literoj! Sed Dr. Zamenhof bone komprenis tiun ĉi fakton, kaj diris ke oni ĉiam povas anstataŭi ilin per la litero "H." Estas multaj kaŭzoj kiuj forigos ilin. Presistoj ne havas ilin: Telegrafistoj ne akceptas ilin, eĉ en landoj kies naciaj lingvoj enhavas akcentojn: Maŝin-kompostado nebligas ke oni uzu ilin. k.t.p. Komprenoble tiuj ĉi plene sufiĉas por ke akcentoj estu forigitaj. Tiu ĉi gazeto eble devos per maŝinkompostado presiĝi. Tamen ni scios kion fari kiam tiu ĉi tempo alvenos. Se iaj el la proponitaj anstataŭaĵoj ne plaĉas al la Angla okulo, ni ĉiam memoru ke aliaj certe ne plaĉas al la Itala okulo (ch, gh.) k.t.p. Estas tute neeble ke oni povu elekti signojn kiuj plene akordigis kun ĉiuj. la naciaj lingvoj.

*Unueco estas forteco! Ni do unuigu pri tiu ĉi necesega anstataŭaĵo.*

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Librarian, P. Howard, Esq., The Bungalow, Cranes Park, Surbiton, Surrey.

The books most read are:—

"Student's Complete Textbook," by J. C. O'Connor, B.A., 1s. 8d., post free (revised edition).

"Thirty-five Exercises with Keys," by A. Motteau, 1s. 3d., post free (6 copies for 6s. 6d.).

"No. 52," a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d.

Fundamenta Krestomatio; Dr. Zamenhof, 3s. 4d.

"Hamlet," translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Stories from back "L'Espérantistes," 2d. each.

"Tourist's Phrase-Book," in 6 languages, 6d.

Esperanta Sintakso de P. Fruictier, 1s. 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are:—

"La Lingvo Internacia," printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

"L'Espérantiste," in French and Esperanto, 4s.

"La Lumo," in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Belga Sonorilo," in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Bohema Esperantisto," in Czech and Esperanto, 3s.

"La Rondiranto," in Bulgarian and Esperanto, 3s.

The new "Internacia Medicina Revuo" will appear every two months. Subscription 6s. 6d. per annum.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries, 2s. 6d. each.

"French-Esperanto Vocabulaire," 2s. 6d.;

"Esperanto-French Dictionnaire," 1s. 6d.

"Braille Instruction-Book for the Blind," 4s.

Translation of the above into English, 6d.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.

## GIGANTO MALESPERO.

Eltiraĵo el "LA PROGRESADO DE LA PILGRIMANTO" DE JOHANO BUNJANO, tradukita de JOSEPH RHODES.

Nun estis ne malproksime de tiu ĉi loko kastelo nomita Duba Kastelo, kies posedanto estis Giganto Malespero, kaj estis sur lia bieno ke ili nun dormis; tial li, levigante sin en la frua mateno, kaj promenante sur siaj kampoj, kaptis Kristanon kaj Esperemon dormantajn sur siaj teroj. Tiam, per timiga kaj malamika voĉo li ordonis ke ili vekigu, kaj demandis ilin de kie ili venis, kaj kion ili faris sur liaj teroj. Ili respondis ke ili estas pilgrimantoj, kaj ke ili perdis la vojon. Tiam diris la giganto—Vi dum tiu ĉi nokto pekis kontraŭ mi, piedbatante kaj kuŝante sur miaj teroj, kaj tial vi devas iri kun mi. Tiel ili estis devigitaj iri, ĉar li estis pli fortika ol ili. Ankaŭ; ili ne povis nur iom diri, ĉar ili sin sciis kulpaj. La Giganto tial forpelis ilin antaŭ li kaj enmetis ilin en sian kastelon en tre malluman subteran malliberejon, kiu estis malkomforta kaj malbonodora. Tie ĉi, do, ili kuŝis de Merkredo matene ĝis Sabato nokte, sen unu peco da pano aŭ guto da trinkaĵo, aŭ lumo, aŭ iu por demandi kiel ili sanas. Ili estis do, en malbona stato, kaj malproksime de amikoj kaj konatuloj. Nu, en tiu ĉi loko Kristano havis duoblan malĝojon, ĉar estis per lia nekonsiderita konsilo ke ili estis alportitaj en tiun ĉi mizeregon.

Nu, Giganto Malespero havis edzinon, kaj ŝia nomo estas Senkonfido. Tial, kiam li kuŝiĝis, li rakontis al ŝia edzino tion, kion li faris: nome ke li prenis duon da kaptitoj, kaj ĵetis ilin en sian malliberejon ĉar ili piediris senpermeso sur liaj teroj. Tiam li demandis de ŝi, ankaŭ, kion li plej bone devas fari je ili. Tiel ŝi demandis de li, kiaj ili estas, de kie ili venas kaj kien ili iras; kaj li diris al ŝi (ĉion). Tiam ŝi konsilis lin ke, tiel baldaŭ kiel li estos leviginta je la mateno, li devus bati ilin senkompatate. Tiel, kiam li estis leviginta, li alprenas al si pezan sovaĝpomarban bastonegon, kaj iras malsupren en la malliberejon ĉe ili, kaj unue riproĉas ilin kvazaŭ ili estas hundoj, kvankam ili neniam diris al li unu malsatan vorton; tiam li atakas ilin kaj bategas ilin tiamaniere ke ili ne povas helpi sin, aŭ sin turni sur la planko. Tion farinte, li eliras, kaj lasas ilin kunsimpatii ilian doloron, kaj malĝoji sub ilia mizerego; tiel la tutan tiun tagon ili pasigis sian tempon, nenion farante sed sopirante kaj maldolĉe ploregante. La proksiman nokton ŝi, parolante kun ŝia edzo plie pri ili, kaj sciigante ke ili ankoraŭ vivas, inspiris al li, ke li konsilu ilin mortigi sin; tiel, kiam

mateno alvenis li iras al ili en malamika maniero kiel antaŭe, kaj vidante ke ili estas tre doloraj pro la batoj kiujn li donis al ili la antaŭan tagon, li diras al ili ke, ĉar ili espereble neniam povus eliri el tiu loko, ilia sola rimedo estus tuj fari finon de si mem aŭ per tranĉilo aŭ ŝnuro aŭ veneno; ĉar, kial, diris li, vi elektus vivi, vidante ke la vivo estas akompanita de tiel multe da maldolĉeco? Sed ili petis ke li liberigu ilin. Je tiu li malbelege rigardis ilin, kaj ĵetante sin sur ili, sendube estus mortiginta ilin li mem, sed ke li falis en unu el siaj kutimaj konvulsioj (ĉar kelkafoje en sunbrila vetero li falis en konvulsioj) kaj perdis dum kelke da tempo la uzon de siaj manoj; tial li sin eltriris kaj lasis ilin, kiel antaŭe, konsideri kion fari. Tiam la malliberuloj interparoladis inter si ĉu estas pli bone preni lian konsilon aŭ ne; kaj tiel ili ekparoladis:—Frato, diris Kristano, kion fari? La vivo, kiun ni nun vivas estas mizera. Miaparte, mi ne scias, ĉu estas pli bone vivi tiamaniere, aŭ morti tuj. Mia animo elektas sufokigon plivole ol vivon. Kaj la tombo estas pli senĝena por mi ol tiu ĉi kelmalliberejo! Ĉu ni devas esti konsilataj de la Giganto?

Esperemo.—Ja, nia nuna stato estas terura, kaj morto estus pli bonvena al mi ol ĉiam tiele resti. Sed ankoraŭ ni konsideru, la Sinjoro de la lando al kiu ni iras estas dirinta. "Ĉi ne devas fari mortigon"—ne, ne al alia homo; multe pli, do, ni estas malpermesitaj preni la konsilon de la Giganto mortigi nin mem. Cetere, li kiu mortigas alian nur faras mortigon sur lian korpon, sed kiam oni mortigas sin, tiu estas mortigi samtempe korpon kaj animon. Kaj plie, mia frato, ĉi parolas pri senĝeno en la tombo; sed ĉu ci forgesas la inferon, kien certe la mortiginto iros? Ĉar "nenia mortiginto havas eternan vivon." Kaj ni konsideru ree, ke la tuta leĝo ne estas en la mano de Giganto Malespero. Aliaj, ĝis tio, kion mi povas trovi, kaptiĝis de li same kiel ni, kaj ili ankoraŭ forkuris el siaj manoj. Kiu scias ĉu Dio, kiu la mondon faris, ne volos igi tiamaniere ke Giganto Malespero mortu; aŭ ke kelkatempe li forgesu enŝlosi nin; aŭ ke li baldaŭ povos esti prenita de alia el siaj konvulsioj antaŭ ni, kaj perdi la uzon de siaj membroj. Kaj se iam tio reokazos, miaparte mi decidigas fortigi mian viran koron, kaj fari mian eblon por eliri el sub lia mano. Mi estas malsagulo ke mi ne provis ĝin fari antaŭe; sed tamen, mia frato, ni estu paciencaj kaj ni



suferu iom plu ; eble la tempo alvenos, kiu donos al ni ĝojan liberon ; sed ni ne fariĝu niaj memmortigantoj. Per tiuj ĉi vortoj Esperemo nuntempe moderigis la animon de sia frato ; kaj tiamaniere ili daŭris kune en la mallumo tiun ĉi tagon, en sia malĝoja kaj dolora stato. Nun, kiam la noktigo aproksimiĝis, la Giganto ree malsupreniras en la kelon por vidi ĉu siaj kaptitoj ankoraŭ prenis sian konsilon ; sed kiam li estas tien alveninta, li trovas ilin vivaj, kvankam, vere, nur vivaj ; ĉar nun de manko de pano kaj akvo, kaj pro la vundoj ricevita kiam li bategis ilin, ili apenaŭ povas plu fari ol spiri. Sed, mi ripetas, li trovis ilin vivaj ; je kio li ekkoleregis kaj diris al ili ke, ĉar ili malobeis konsilon sian, estos pli malbone por ili ol se ili neniam estis naskitaj.

Je tio ĉi ili tre tremis, kaj mi pensas ke Kristano svenis, sed li retrovante sin iom, ili reprenis sian interparoladon pri la konsilo de la Giganto, kaj ĉu ankoraŭ estus pli bone ĝin sekvi aŭ ne. Nun Kristano ree ŝajnis esti preta tiel fari ; sed Esperemo faris sian duan respondon jene :—Mia frato, diris li, ĉu ci ne rememoras kiel kuraĝa ci estis antaŭe ? Apoliuno ne povis premegei cin, nek tiel povis fari ĉiuj, kiujn ci aŭdis, aŭ vidis, aŭ sentis en la Valo de la Ombro de Morto. Kiajn malfacilaĵojn, teruron kaj miregon ci jam trapasis, kaj ĉu ci estas nun nur timoj ? Ci vidas ke mi ankaŭ estas en la subtera malliberejo kun ci, mi kiu estas nature homo tre plimalforta ol ci ; ankaŭ tiu ĉi Giganto vundis min same kiel ci, kaj forprenis la panon kaj akvon de mia buŝo, kaj kun ci mi malĝojas sen la lumo. Sed iom pli ni ekzercu la paciencon. Rememorigu kiel ci kondutis cin vire ĉe Vaneca Foiro, kaj ne estis timigita nek per la Ĉeno nek la Kaĝo, nek ankoraŭ per la sanga morto. Tial almenaŭ por eviti la honton en kiu ne estas deca ke oni trovas Kristanon, ni fortigu nin pacience kiel eble plej bone.

Nu, la nokto estante reveninta, kaj la Giganto kaj lia edzino estantaj lite, ŝi demandis al li pri la kaptitoj, kaj ĉu ili ankoraŭ prenis lian konsilon. Al kio li respondis—Ili estas obstinaj friponoj ; ili elektas prefere porti ĉiujn fortulojn al formortigi sin. Tiam diris ŝi—Konduku ilin en la kastelan korton morgaŭ, kaj montru al ili la ostojn kaj kranciojn de tiuj, kiujn ci jam estis mortigintaj ; kaj kredigu ilin ke, antaŭ semajno finiĝos, ci disŝiros ilin, kiel ci faris al iliaj kunuloj antaŭe. Tiel, kiam tagiĝis, la Giganto ree iras ĉe ili, kaj kondukas ilin en kastelan korton, kaj montras al ili laŭ la ordono de sia edzino. Tiuj ĉi, diras li, estis antaŭe pilgrimantoj kiel vi ; kaj ili pekiris sur miajn terojn kiel vi faris ; kaj kiam plaĉis al mi, mi disŝiris ilin, kaj tiamaniere mi faros al vi post dek tagoj. Reiru malsupren ĉe via kelo ! Kaj tiel dirante, li batis ilin laŭlonge la tuta vojo

tien. Ili kuŝis, do, la tutan Sabaton en dolorega stato kiel antaŭe. Nu, kiam la nokto alvenis, kaj kiam Sinjorino Senkonfido kaj ŝia edzo la Giganto kuŝiĝis, ili rekomencis sian interparoladon pri siaj malliberuloj ; kaj plie la maljuna Giganto miris ke li povis nek per siaj battoj nek konsilo finigi ilin. Sur tio, sia edzino respondis. Mi timas, ŝi diris, ke ili vivadas esperante ke oni alvenos kaj liberigos ilin, aŭ ke ili posedas ŝlosajn malfermilojn ie, per kiuj ili esperas forkuri. Ĉu vi tiel diras, karino mia ? respondis la Giganto, mi ekzamenos ilin la proksiman matenon.

Nu, Sabate ĉirkaŭ noktomezo, ili komencis preĝi, kaj daŭrigis preĝi ĝis preskaŭ tagigo. Nu, iom antaŭ ol la taglumo, la bona Kristano, kiel unu duonmirigita, eksplodis en tiun ĉi pasian paroladon. Kia malsaĝulo, diris li, mi estas, tiamaniere kuŝi en malbonodora kelmalliberejo, kiam mi povis egale promenadi en libereco : Mi havas ŝlosilon en mia brusto nomitan Promeso, kiu malfermos, mi estas certigita, ian ŝlosen en Duba Kastelo. Tiam diris Esperemo. Tio ĉi estas bona sciigo ; bona frato, ektiru ĝin el cia brusto kaj provu. Tiam Kristano eltiris ĝin el sia brusto kaj komencis provi ĉe la pordo de la kelo, kies riglilo, kiam li turnis la ŝlosilon, cedis kaj la pordo subite kaj facile malfermiĝis, kaj Kristano kaj Esperemo ambaŭ eliris. Tiam li iris al la ekstera pordo, kiu kondukas en la kastelan korton, kaj per lia ŝlosilo malfermis tiun pordon ankaŭ. Post tiu, li iris al la fera pordego, ĉar estis necese ke oni devu malfermi tiun ankaŭ ; sed tiu ŝlosilo funkciis infere malfacile, ankoraŭ la ŝlosilo malfermis ĝin. Tiam ili elpuŝis la pordegon malferme por forkuri rapide ; sed tiu pordego malfermante faris tian krakadon ke ĝi vekigis Giganto Malesperon, kiu rapide levigante sin por sekvi siajn kaptitojn, sentis siajn membrojn malapogi sin ; ĉar siaj konvulsioj sin reprenis, tiel ke li ne iel povis kuri post ili. Tiam ili piediris kaj atingis la Reĝan ĉefvojon kaj tiel estis savaj, ĉar ili estis ekster lia regeco.

## LA SPEGULO.

Knabineto sin admiris

En spegulo.—“Dio gardu

Ke vi tion tro rigardu !”

Ĝin patrin' prenante diris.

“Vidi min mi multe volas !”

Krias tuj la filineto—

Kun mal'ela grimaceto,

Tre kolere ŝi parolas—

“Vidu do grimaculinon

Kiun krie vi alvokas !

Malobeis ŝi patrinon . . .

La spegulo nun ŝin mokas !”

A. MOTTEAU.

## CORRESPONDENCE NOTES.

Several enquirers have written for information as to the method of dividing the words in Esperanto. No rule seems to exist. The usual custom is to divide them according to their pronunciation, and not etymologically. Take the word *Krajonon* for example. When split up into syllables, this reads kra-jo-non, and is pronounced krah-yoh-nohn.

F.G.R. of Nottingham is a most energetic supporter of our Cause, for, in addition to lecturing on Esperanto, he has carefully studied the vocabulary in the Text-book, comparing the two parts. As a result of this examination he has found many items which are of general interest. On page 133 *Rent* is given as *Rento*, whereas on page 154 *Lui* is given as meaning *to rent*. This is quite correct, for, in the first instance, *rent* is *income*, rent roll; in the latter case, of course, it signifies *hire*. "One word, one meaning," is an Esperanto maxim. The word *Makleristo* also presented difficulty, as the simple verb *Makleri* is not given. It means *to do the business of a broker*. Hence *Makleristo* is a *broker*.

I must thank the many friends who have kindly written pointing out Press errors in THE ESPERANTIST. While regretting that it is impossible to eliminate these altogether, a monthly errata list of the preceding Gazette is not necessary, unless the errors be of real consequence. I must, however, in justice to the authors, call attention to the following unaccountable slips in previous numbers. On page 43 the saying of Napoleon

was incorrectly given as *Milcentjaroj vin rigardas*. It should, of course, have been *Kvardek centjaroj*. Also Mr. Motteau calls attention to the following errata in *La Ventego*. Page 21, Scene 2, line 4, should read *Ĉiel' malbonodoran peĉon vomu*, and the last line but three on page 40 should read *Privilegio ĉian li posedis*.

While referring to the correspondence on matters connected with THE ESPERANTIST, friends are requested to always write to the Editor direct, contributors being responsible for only those items which bear their signatures. By so doing, friends will save time and trouble to themselves and others who have no official connection with the Gazette.

DEAR SIR,—I was much interested to see, in the January Gazette, a short article by Esperantisto 8105 on the Esperanto rendering of the preposition "of," and I am sure that many of us found the information therein very useful. The gifted author of our language has told us that "*ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon*"; it is of the utmost importance, therefore, that we should endeavour to find out what prepositions in our national languages correspond with those he has selected. With this object I hope from time to time, as the Editor may permit, to give lists of sentences, illustrating curious usages, not only of prepositions, but also of other words which offer difficulty to English-speaking peoples.

The following phrases deal with the preposition "By."

## BY.

He is loved by all his friends,  
He was holding him by the neck by (or with)  
both hands,  
The little boy returned home quite by himself,  
He left the town by a by-way,  
I want to stand by mother,  
I stood by while he talked with his friend,  
Not even a mouse ran by,  
In this minute two ladies passed us,  
I went by the windows of the house,  
I am remaining here by the advice of my doctor,

Li estas amata de ĉiuj siaj amikoj.  
Li tenadis lin je la kolo per ambaŭ manoj.

La knabeto revenis domon tute per si mem.  
Li eliris la urbon per flanka vojeto.  
Mi volus stari apud la patrino.  
Mi staris apude, dum li paroladis kun sia amiko.  
Eĉ muso ne preterkuris.  
En tiu ĉi minuto iris preter ni du sinjorinoj.  
Mi iris preter la fenestroj de la domo.  
Mi restadas tie ĉi laŭ la konsilo de mia kuracisto.

## DIVERSAJ AVIZOJ.

Notice is hereby given that, by the kind permission of M. Themoine, the Free Class at The Gouin School (34, Harrington Road, near South Kensington Station) will be held on Wednesday, at 6.30, instead of Monday, commencing on February 3rd. Mr. E. A. Millidge has kindly consented to preside. The other free classes continue as before.

On Thursdays, 6.30, at The Gouin School, 16, Finsbury Circus, E.C., followed at 8 o'clock by a Conversation Class. For further particulars write to Miss Schafer, 8, Gloucester Crescent, Regent's Park, N.W.

Every Tuesday, at The Raleigh College, Brixton Hill, S.W., at 8 p.m.

Every Tuesday, at The Commercial College, Woodgrange Road, Forest Gate, E., at 7.45.

Every second Monday in the month there is a Reading Circle at Mowbray House, Norfolk Street, Strand, at 6.30.

Kvankam la Esperanta movado estas tiel juna inter ni, Anglujo jam komencas disvastigi la lingvon tra la mondo. Estas malfeliĉe, ke du el niaj plej agemaj kunverkantoj estas devigitaj forvojaĝi, unu al Hindujo, kaj alia al Aŭstralujo, sed, kvankam ni Londone perdas, sendube tiuj ĉi novaj teroj por la lingvo multe gajnos per la sindonemeco de ambaŭ el tiuj ĉi Esperantistoj. Al ili, kaj al la rezultato de iliaj klopodoj, ni sendas ĉiujn bondezirojn.

En la lasta Esperantist troviĝis tri problemoj kies solvojn nun aperos. (I.) Milion', Milton'. (II.) Anas', Ananas', amas'. (III.) Knab', Bank'. Aglo, Olga.

Estis proponite presigi la nomojn de la divenintoj, sed tiel granda nombro de legantoj estas eltrovintaj la solvojn, ke spaco tute mankas. Se iu el ili ne estas ricevintaj la dekduon da Esperantaj poŝtkartoj, ni petas, ke ili sciigu nin.

La Societo Esperanta Kihlie estas ĝuinta la viziton de Sveda Samideanino, Fraŭlino Hilda Cederblad, kiu espereble, havos feliĉan tempon kunparolante kun Anglaj Esperantistoj. Sendube la intersanĝo de pensoj kun anoj de aliaj landoj estas la plej bona ilo por lerni Esperanton.

Plezure ni ricevis *The Indian Magazine* (price 3d. from Messrs. Phillips, 121, Fleet Street) kaj legis la tuton de la interesa parolado de Dr. Pollen, C.I.E., pri kiu estis anonco en nia Januara numero. Dek tri paĝoj de tia legindaĵo devas esti sufiĉaj

por puŝi kelkajn Esperantistojn ke ili aĉetu la gazeton.

Inter la Esperantistoj en Newcastle-on-Tyne estas tri fremdaj konsuloj. Kompreneble, konsulo estas unu el la unuaj por ekkoni la utilaĵojn de lingvo internacia, sed estas grava fakto ke, en tiu urbo, la reprezentantoj de Unuigitaj Ŝtatoj, Italujo kaj Belgujo estas Esperantistoj.

Jen interese ga letero de sindonema apoganto.

"ESTIMATA SINJORO REDAKTORO,—Ĝis nun mi neniam legis ion, aŭ en la Esperantaj Gazetoj, aŭ en la korespondado pri la utileco kaj facileco de la lingvo Esperanto en aliaj ĵurnaloj, pri la instruado de ĝi al geknaboj, kiuj nur lernis siajn patrujajn lingvojn. Certe mi ofte ricevis poŝtkartojn de Francaj knaboj, kiuj diras ke ili eklernas Esperanton, kaj kolektas ilustritajn poŝtkartojn aŭ poŝtsignojn k.t.p. Sed tiuj ĉi, kredeble, jam eklernis aliajn lingvojn. Ĉu neniu el niaj patroj Esperantistaj okinstruas al siaj infanoj Esperanton? Kial ne? Sendube estus tre bone. Knaboj kaj knabinoj lernante fremdajn lingvojn ne kuraĝas paroli aŭ skribi ilin kaj, ordinare, ne havas ian okazon por parolado kaj skribado. Sed kiom da knaboj estus feliĉaj se ili povus korespondadi pri kolektoj de poŝtsignoj, aŭ pri ludoj, objektoj de naturscienco k.t.p. se ili lernus, ke nun ekzistas lingvo tre facila por interrilatoj kun alilandaj knaboj.

Esperanto estas la plej viva kaj plej sana el ĉiuj lingvoj, ĉar ĝi ne naskiĝis infaneto, sed maturaĝa, kaj ili ŝanĝiĝis kaj maljuniĝis.

Bone estus memori, ke ni estas la idoj de la estinteco, sed pli bone ke ni estas la patroj de la estonteco, kaj Esperanto ne estas nur praktika lingvo por hodiaŭ sed ĝi alrigardas la estontan progresadon de la homaro, kaj povas konigi nin kun ĉiuj alilanduloj, kiujn ni nomas, sed sen ia kompreno de la vorto, niaj fratoj.

Kun respektaj salutoj, Via, Esperantisto, 4686.

Vere signifa letero! Mi bone memoras ke, estante en Havro, mi renkontis du belajn infanetojn, kiuj bone parolis Esperanton, kiun zorge instruis je ili la gepatroj. Kaj ŝajne infanoj tre amas Esperanton. Certe en Anglujo, mi ĉiam observis, ke la plej interesituloj estas ofte geknaboj. Eble la propono, ke ili eklernu tian novan lingvon, enhavas iom da novaĵo, kaj tial estas precipe interesa. Sed ne estas dubeble, ke la studio de Esperanto plene taŭgas por la instruado de infanoj, ĉar ĝi estas lingvo facila, senescepta, kaj logika, kaj, pli ol ĉia, la lernantoj de Esperanto devas *pripensi*, ne nur *memori*.

## PRI SCIENCAJ AFEROJ.

Provoj estas farintaj de Doktoro de Forest por plirapidigi la elsendon de signaloj. Antaŭ multaj tagoj li sukcese signalis po tridek vortoj dum minuto, kaj li kredas ke li povos signali po kvindek vortoj dum minuto, per sia sistemo kiu malsimilas al tiu de Signor Marconi. Membroj de la Poŝtoŝejo kaj de la Mar kaj Militafakoj ĉeestis ĉe tiuj ĉi provoj apud Holyhead.

La elektra forigo de nebulo, pri kiu sukcesaj eksperimentoj jam estas faritaj, estos, kiam perfektigita, utiliga sur la maro. Sir Olive Lodge,\* kiu laboras pri tiu ĉi afero kaj kiu ĝis nun sukcesis, komencos eksperimentojn sur la rivero Mersey. Li starigos sur ĉia bordo mastojn, tiuj je unu flanko havos flamojn pozitive ŝargitajn, kaj je la alia, havos malpozitivajn flamojn. Por fari tiujn ĉi provojn, oni devas uzi fluon de pli ol 100,000 voltaj. Oni esperas ke, per tiu ĉi ilo, oni povos klarigi la riveron je nebuloj.

Antaŭ ne longe Sinjoro Curie, paroladante en Parizo pri Radiumo, montris ke ne estas eble ŝargi elektroskopon kiam radiumo apudestas. Por tiun ĉi efektiviĝi oni devis kovri la radiumo per dika kovrilo de plombo, kaj ĝin porti al la malproksima fino de la ĉambro. Tiam, kiam la elektroskopo estis ŝargita, ĝi tuj disŝargiĝis kiam la radiumo estas apudportita.

ESPERANTIST 8105.

\* Sir Oliver Lodge afable skribis al ni kaj permesis ke ni traduku lian famegan paroladon pri radiumo en "*nian kuriozan lingvon*"; sed, ĉar la tuton de la legantaro eble jam estas legintaj tiun ĉi artikolon, ni esperu ke Sir Oliver Lodge baldaŭ bonvolos sendi alian interesajon. Kaj ni ankaŭ esperu ke ĝi estu Esperanteskribita.

## ITALAJ PROVERBOJ.

1. Blindulo ne povas juĝi pri koloroj.
2. La ambuso daŭras pli longatempe ol la martelo.
3. Ĉiu forpelu la muŝojn per sia propra vosto.
4. Dio donacas filojn, sed la diablo nevojn.
5. Pli bone estas ovo hodiaŭ, ol kokino morgaŭ.
6. La sama fajro purigas oron kaj konsumas pajlon.
7. Bona kuracisto neniam prenis medicinon.
8. Pli bone estas fali de la fenestro ol de la tegmento.
9. Ne estas hundo kiel ajn malbona, kiu ne skuas sian voston.
10. Kiu ne ludas (hazarde) gajnas sufiĉe.

(4686).

## THE HYMN OF THE ESPERANTISTS.

A mighty voice is sounding thro' the world,  
The sons of men at last awaking  
To keener hatred of the wrongs of war  
Than ever rankled in their hearts before ;  
A snow-white banner to the winds unfurled  
The power of the sword is breaking !  
Beneath this symbol of a sacred hope  
Warriors of Peace in hosts assemble ;  
They battle not with sceptre or with crown ;  
They fight to break the age of barriers down  
That sever man from man. With these they cope,  
And now the walls are set a-tremble.  
Soon they shall totter to the waiting dust,  
The might of love no more attending,  
And by the blessing of a common tongue,  
The visioned peace that countless bards have sung  
Shall live in truth ; the flashing sword shall rust,  
No lust of blood its aid demanding !  
FRED CROOK.

## LIMERICK IN ESPERANTO.

Estis foje junul' en Armagh  
Kiun glutis grandega boa'  
Oni lin tuj eliris  
Kaj li poste diris :  
" Estas varmege en la boa' ! "

ESPERANTIST 7891.

## ĈU VI ESTAS PRETA?

En tago la maljuna Rothschild en Frankforto venigis en sian oficejon sian ĉefoficiston, kaj demandis lin kiom da tagoj li bezonos por pretiĝi je vojaĝo en Amerikon. (La firmo Rothschild intencis tie fondi branĉbankon).

Pripensinte la aferon, la oficisto diris : " post dek tagoj mi estos preta." " Nu " respondis Rothschild, " mi sciigos al vi se mi postulos viajn servojn." Tiam li vokis alian oficiston, al kiu li metis la saman demandon. " Mi vin petas ke vi donu al mi tri tagojn " tiu ĉi respondis. Tria oficisto estis vokata, kaj tiu ĉi tuj kaj decide respondis " Mi estas preta nun." Bone, bonege, ekkriis Rothschild, kaj aldonis : " De la hodiaŭa tago vi estas kunposedanto de mia nova firmo en Sta. Franzisko. Vi forveturos morgaŭ matene kaj vi estas la ĉefo de la tiea banko." Tiu viro, kiu per sia preteco kaj taŭgeco, metis tiam la fundamenton por granda riĉeco, estis Julio May.

Tradukis ELISE BAUER.

No. 5.

THE

March, 1924.

# ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the spreading  
of the International Language.

Edited by H. BOLLEBROKE M.D.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs); 1½ roubles; 75 cents.

Published by THE LONDON ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.

## CONTENTS.

|  | Pages |
|--|-------|
| THE ALIENY PROBLEM (The Editor) ..   | 65-69 |
| A FRENCHY WAYS (Kaperantist 1890)  | 67    |
| ITALIAN FOLKSONG (Clarence Bakewell)                                       | 68    |
| SPANISH PROVERBS (Kaperantist 1896)  | 68    |
| THE FARMER (continued from pages 5, 21,<br>22 & 23 translated by A. Human) | 69    |
| MATEO PARRON (Eliie Bauer) ..  | 70-72 |
| TWO BOWLING (translated by A. Human)                                       | 72    |
| FAMOUS ITEMS OF INTEREST ..  | 73    |
| COMMERCIAL NOTES ..  | 74-75 |
| THE BIRTH OF ESPERANTO (translated<br>by John Ellis) ..                    | 75-76 |
| HOW HONORARY (The Editor) ..   | 76    |
| THE LANGUAGE OF FLOWERS (Don Elroy)  | 79    |
| TWO TABLES FROM LAFONTAINE (D.W. Niles)                                    | 79    |
| THE SONG OF HEAVEN (L.H. Mayrick)  | 80    |

## FOR FREE PARTICULARS write to the HON. SECRETARIES of ESPERANTO SOCIETIES at

|  |
|--|
| BOURNEMOUTH, I. F. H. Woodward, Esq.,<br>Norwood, St. Stephen's Road.  |
| DUBLIN, C. Fournier, Esq.,<br>Celtic Association, St. Stephen's Green. |
| EDINBURGH, Miss Trevelin, M.A.,<br>5, Spence Street.                   |
| GLASGOW, J. Hunter, Esq.,<br>125, Darnley Street, Pollokshields.       |
| BUDDENSFIELD, G. H. Taylor, Esq.,<br>12, Holly Hill Road.              |
| KIDGLEY, J. Ellis, Esq.,<br>Compton Buildings, Row Street.             |
| LONDON, H. Bollebrooke M.D.,<br>41, Outer Temple, W.C.                 |
| NEWCASTLE, H. W. Clephan, Esq.,<br>3, Colburn Terrace, Gateshead.      |
| PLYMOUTH, J. A. Thell, Esq.,<br>2, Barton Crescent, Marnmouth.         |
| FOURMOUTH, J. Greenwood,<br>21, St. George's Square.                   |
| SUDBURY, P. Howard, Esq.,<br>The Bungalow, Crane Park.                 |
| TYNEMOUTH, Alan F. Davidson, Esq.,<br>25, Back Greenway St. Shields.   |
| WIMBORNE, W. Ings, Esq.,<br>Hawker Buildings, Wimborne.                |

A 2/- a weekly paper last continued that we will  
be able to give you the information you need. The  
"Esperantist" will be the best of all papers of any kind  
in the world.

## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

*Unbound by ties of nationality:  
The common bond of union of all civilised peoples.*

The Remington can be supplied fitted for Esperanto.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
109, Gracechurch St., London, E.C.

## La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMAŝINO.

*Pripensu je tio!*

LA INTERNACIA MAŝINO.

*Tute liberigita de naciaj ligiloj:  
La Komuna unuigilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.*

La Remington estas liverita kun Esperantaĵa gravilistaro.

LA REMINGTON TYPEWRITER KOMPANIO,  
109, Gracechurch St., London, E.C.

### To Interest Your Friends,

Send 2/6 to the Librarian, F. HOWARD, Esq.,  
The Bungalow, Cranse Park, Surbiton, for 6  
copies of No. 52. These can subsequently be  
returned with 1/3 extra, and exchanged for The  
Complete Text Book if desired.

### THE NEWEST PERFUME.

## ESPERO.

Green and Gold Label printed  
in Esperanto.

Price 1/-. Post Free, 1/6.

GEO. C. LAW, 394, King's Road, Chelsea,  
London, S.W.

# Esperanto



#### WHAT IS ESPERANTO?

THE second language for all Nations. Already  
about 100,000 persons know it. When travelling  
abroad, for business or pleasure, you will all  
over find that it is ready to converse or  
correspond in this simple and elegant lan-  
guage. The wonderful simplicity of its grammar  
surprises you. There are no exceptions to its  
rules; spelling is phonetic. Acquaintance will find  
it very easy to learn.

For Complete Text Book, send 1s. 6d. to—  
HEN. BEE, ESPERANTO CLUB,  
11, Gutter Temple, London, W.C.  
A Language of living utility, yet sadly heeded  
is still wanted.

Facsimile of the Esperanto Postcard.

On Best Ivory Card, 1/1 for 50.  
Please state whether inland or foreign.

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec. ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
CANADA.—A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal.  
FRANCE.—M. Paul Fruitier, Boulevard Arago 27, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Myba, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—G. B. Smith, Esq., 19, Wiborg Quay, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan Stockholm.  
TRINIDAD.—Geo. O. Messerly, Esq., Port of Spain.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtsignon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtsignoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

No. 5.

MARTO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

## KARAJ LEGANTOJ, SALUTOJN !

The Esperantist ! Kio estas la signifo de tiu ĉi vorto ? Kompreneble ĝi devas esti (1) Tiu, kiu lernas, kaj uzas, Esperanton : (2) Tiu ĉi malgranda Gazeto, en la sama lingvo presita.

Kaj kio estas Esperanto ? Ĝi estas tio, kion nia bona estro, Doktoro Zamenhof, donis al la mondo, post kiam li estis studinta multajn Eŭropajn lingvojn.

Ĉu ni do estos pravaj, enkondukante niajn proprajn "plibonigojn" en la lingvon ? Kaj ĉu tiu ĉi Gazeto prave povos sin nomi THE ESPERANTIST, se estos en ĝi presita ia ŝanĝo, neaprobata de la aŭtoro de la lingvo ? Tute ne.

Je la kvindek naŭa paĝo, en la Februara Numero, ni vidis kelkajn el la kaŭzoj, kiuj pruvas ke la signoj tre malhelpas nian progresadon ; kaj ankaŭ estis anoncite ke Doktoro Zamenhof aprobas le uzon de la litero H anstataŭ la supersigno.

Tiu ĉi certe estas lerta kaj sufiĉa, tamen ĝi ŝajne ne plaĉas al kelkaj el niaj Anglaj studentoj. Tute forgesinte ke, kiam oni estas lernonta ian lingvon, oni devas komenci per la alfabeto, ili imagas ke la Esperantaj konsonantoj devas esti laŭ la *Angla* uzo. Ŝajne alilandaj amikoj ne estis pripensitaj.

Mi kredas ke ni en Anglujo prave aprobas la uzon de GH, HH, JH, ĉar oni tre facile memoras iliajn sonojn. Kaj mi ankaŭ kredas ke la Italoj ne juste malaprobos CH kaj GH, kvankam iliaj sonoj estas tute malsanaj je la uzo de la Itala lingvo.

## DEAR READERS, GREETING !

The Esperantist ! What is the signification of this word ? Naturally it must be (1) One who learns and uses Esperanto ; (2) This little Gazette printed in the same language.

And what is Esperanto ? It is that which our good chief, Dr. Zamenhof, gave to the world after he had studied many European languages.

Therefore should we be justified in introducing our own "improvements" into the language ? And could this Gazette rightly call itself THE ESPERANTIST if in it were printed any change not approved of by the author of the language ? Certainly not.

On the fifty-ninth page, in the February Number, we saw some of the causes which prove that accents greatly hinder our progress ; and it was also announced that Dr. Zamenhof approves of the use of the letter H instead of the accent.

This certainly is both ingenious and adequate, nevertheless it apparently does not please some of our English students. Entirely forgetting that when one is learning any language one must begin at the alphabet, they imagine that the Esperanto consonants must be in accordance with the *English* usage. Apparently our friends in other lands are not considered.

I believe that we in England will rightly approve of using GH, HH, JH, for their sounds are easily remembered. And I also believe that the Italians will not justly disapprove of CH and GH, although their sounds are quite different from the Italian usage.

Ĉar malmultaj studentoj skribadas pri tiuj ĉi akcentoj, mi hodiaŭ sendas al Vi tiun ĉi leteron. Kaj, ĉar Vi estas veraj Esperantistoj, Vi zorge pripensados la aferon, kaj bonvolos sendi al mi poŝtkarte Viajn opiniojn antaŭ Aprilo 10, 1904.

(Adreso, 67, Kensington Gardens Sq., London, W.).

La plimulto el ni en Anglujo (en la tuta mondo eble) ĉiam estas kontraŭ la signoj kriadintaj. Forigu ilin! estas la devizo de multaj el niaj fervoraj helpantoj. Nu, por decidi tiun ĉi demandon, Vi, Karaj Geesperantistoj, povos elekti el tiuj ĉi du proponoj:—

(1). *Ĉu THE ESPERANTIST presigos sen signaj literoj, sed per CH, GH, HH, JH, SH?*

(2). *Ĉu ĝi presigados per la literoj Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ kiel ĝis nun ni faris?*

Mi petegas ke ĉiuj el la Legantoj kiuj pliamas la unuan el tiuj ĉi du proponoj, skribu al mi poŝtkarton, enhavantan la vortojn "Mi kredas ke la uzo de signoj malhelpas je la universala alpreno de Esperanto, kiel Lingvo Internacia."

Tiam, se mi ricevos sufiĉe da tiaj poŝtkartoj. Via deziro estos plenumita, kaj Vi ne plu vidos supersignojn en THE ESPERANTIST.

Eble la plimulto da legantoj jam lernis ke nia fervorega apoganto, Sinjoro W. T. Stead, estas malsanigita, kaj forvojaĝis al Sudafrikujo. Kompreneble ĉiuj Geesperantistoj unuanime sendos al li koregajn bondezirojn je rapidega resaniĝo, kaj esperos ke, antaŭ ne longe, li povos repreni siajn sencesaĵajn penadojn por la plibonigo de la homaro. Nuntempe li malfeliĉe estas paginta la punon de tro da entuziasmo, ĉar li provis fari pli ol eble estas.

La Biblioteko Esperanta denove pligrandigis, per la aldono de la tri sekvantaj libretoj:—

(1). *Vojaĝo interne de mia ĉambro* (kvindek ok paĝoj) estas bonega traduko de la Franca de Xavier de Maistre. La tradukisto, M.S Meyer, trafis sian celon, kaj donis al ni lertegan kaj bonstilan tradukon de tiu interesa verketo.

(2). *Advokata Patelin* (kvardek du paĝoj) estas triakta proza komedio de Brueys kaj Palaprat. Esperantigita de M. J. Evrot. Ĝia enhavo estas tre interesa kaj ŝerca, kaj ĉiuj Esperantistoj ĝuos bonan ridon, je ĝia tralego. Ni gratulu Sinjoro Evrot pri la bona temo kiun li elektis, kaj ni espuru ke, antaŭ ne longe, la komedio aperos en Esperanta teatro, laŭ la deziro de Doktoro Zamenhof. La legado de komedioj multe helpas la paroladon de la lingvo.

(3). *Tridek ses elektitaj fabeloj de La Fontaine*, tradukitaj de M. Vaillant, bone taŭgas kiel legolibro Esperanta, ĉar ni jam konas la Anglan tradukon.

As a few students continue writing about these accents, I send this letter to you to-day. And, as you are true Esperantists, you will carefully consider the subject, and will be so kind as to send me, by postcard, your opinions before April 10, 1904.

The majority of us in England (perhaps in the whole world) have ever cried out against the accents. "Away with them" is the cry of many a fervent helper. To settle this question, you, dear Esperantists, can choose between these two proposals:—

(1). *Shall THE ESPERANTIST be printed without accented letters, but by CH, GH, HH, JH, SH?*

(2). *Shall it be printed with accents Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ as heretofore?*

I beg all readers who prefer the first of these proposals to write me a postcard containing the words "I believe the use of accents hinders the universal adoption of Esperanto as an international language."

Then, if I receive a sufficient number of these postcards, your wish shall be carried out, and you will no longer see accents in THE ESPERANTIST.

Probably the majority of readers have already learned that our most fervent supporter, Mr W. T. Stead, has been taken ill, and has gone to South Africa. Naturally all Esperantists unanimously send him most hearty good wishes for a very speedy recovery, and hope that ere long he will be able to renew his ceaseless labour for the betterment of mankind. At present he has paid the penalty of too much enthusiasm, for he has tried to do more than is possible.

The Esperanto Library has become further enlarged by the addition of the three following books:—

(1). *Vojaĝo interne de mia ĉambro* (fifty-eight pages) is a capital translation from the French of Xavier de Maistre. The translator, M.S Meyer, has succeeded in his purpose, and has given us a most able and correct translation of that interesting work.

(2). *Advokato Patelin* (forty-two pages) is a three-act prose comedy by Brueys and Palaprat. Esperanto version by M. J. Evrot. Its contents are very interesting and humorous, and all Esperantists will enjoy a good laugh when reading it. Let us congratulate M. Evrot on the good theme he has selected, and let us hope that before long the comedy will appear in an *Esperanto theatre*, in accordance with Dr. Zamenhof's wish. The reading of plays is a great help to the conversational use of the language.

(3). *Thirty-six selected fables of La Fontaine*, translated by M. Vaillant, are very suitable for reading exercises, as we already know the English versions.



Niaj legantoj jam vidis specimenojn de fabloj Esperantigitaj, kaj espereble tiu ĉi aro plaĉos al ili.

Ni gratulas la tri verkistojn kaj esperas ke ili baldaŭ skribos aliajn (eble originalajn) verkojn.

Ĉiuj el ili troviĝas ĉe The Librarian, London Esperanto Club, 41, Outer Temple. Ĉiu kostas 1/-.

Ni plezure povas anonci ke la de longe atenditaj Vortaroj nun eliris, kaj ke ili multe plaĉis al niaj amikoj. Ni esperas ke, nun kiam oni havas vortarojn, multe pli da Esperantistoj bonvolos sendi al ni artikolojn. Alie THE ESPERANTIST ne povos enhavi sufiĉe da interesaĵoj por gajradi la aprobon de ĝia tutmonda Abonantaro.

Our Readers have already seen specimens of fables in Esperanto, and it is to be hoped that this collection will give pleasure.

We congratulate the three authors, and hope that they will soon write other (possibly original) works.

All are to be had from the Librarian, London Esperanto Club, 41, Outer Temple, W.C. Cost 1/- each.

We announce with pleasure that the long-awaited Dictionaries have now appeared, and have greatly pleased our friends. We hope, now that one has dictionaries, that many more Esperantists will be so kind as to send us articles. Otherwise THE ESPERANTIST cannot contain sufficient interesting matter to continue to gain the approval of its world-wide Subscribers.

## FEBRUARA PROMENO.

### Origine Verkita de Esperantisto 8380.

Tagmezo estas pasiĝinta. Vento fariĝis ventego. Grandaj hajleroj komencas stertori furioze kontraŭ la vitroj de miaj fenestroj. Elrigardante, oni povas nenion vidi krom blankan turnegantan amason.

Bruego de elementoj ekscitas homan animon same kiel muziko. En momento spirito de vintro tute posedas min. Varma ĉambro kaj brila fajro estas senpotencaj por min restigi interne. Surmetante mian superveston, mi eliras en blovadegon.

Unue la malvarmo pikas simile al serpento per sia tuŝo. Iom poste mia sango rapide ekfluas, kaj mi estas tute en harmonio kun miaj ĉirkaŭaĵoj, Mi marŝas kontraŭ la blovadego kun sovaĝa ĝojo, kiel soldato marŝas al batalo.

Vojo kuŝas inter du densaj arbetoj. Antaŭ malmultaj monatoj, tiuj ĉi estis vestitaj per folioj kaj floroj; sed kiu diros ke ili tiam estis pli belaj ol nun? Hodiaŭ la supraĵoj de la branĉoj estas kovritaj per neĝo, pli blanka ol lano. Ili prezentas

al mi retajojn, en kiu blankeco kaj nigreco estas mirinde intertekstaj.

Tie ĉi kaj tie, sub arbetoj, malgrandaj birdoj serĉas rifuĝon de la blovegado. Ili sidas kaj tremas, aŭ eble saltadas senreste de loko al loko. Je tia vido venas pensoj pri la suferoj kaŭzataj per senkompata vintra vetero. Vidaĵoj de malvarmaj kaj malsataj bestoj, de infanoj ĉifonvestitaj, kaj senkomfortaj homaj hejmoj, pasas antaŭ mia imago.

Baldaŭ troviĝis malfermoj el la arbetoj, kaj tie la neĝo estas tiel ebena, ke oni ŝancelas detruiri ĝian belecon, sur ĝi marŝante.

Fine mi atingas la supron de monteto, kaj mi vidas ke la nuboj preskaŭ estas forpasintaj, kaj ke la vento estas ĉesinta. Okcidente, la suno flamas simile al granda globo de fajro. Ĝiaj radioj iluminas la ĉielon je punco kaj oro, kaj jetas flavan brilecon sur la suba neĝo.

Tra gloroj de vintra sunkuŝiĝo mi marŝas hejmen, al brila vespera fajro, kaj al mia Esperanta Gazeto.

## IRLANDA LEONO.

Tagon, Irlandano sen okupado renkontis vojaĝantan sovaĝbestaron, kaj demandis la mastron:

“Ĉu mi povas esti utila al vi?”

“Nu, jes,” respondis tiu ĉi, hieraŭ nia sola leono mortigis. “Se vi surmetos lian haŭton kaj aktos en la kaĝo, mi pagos vin.”

“Tutkore mi konsentas!” respondis la Irlandano.

Nokte en la fojron amaso da homoj alvenis por vidi la mirindajn bestojn. La mastro elparolis: “Gesinjoroj, jen ne terura ne malsovaĝigebla Afrika leono. Mi nun metos lin en kaĝon, kun la tigro.”

Je tiuj ĉi vortoj, la “leono” rampis al la bariloj, kaj kviete diris: “Vi forgesas ke la tigro manĝos min!” Sed la mastro, svingante la vipon, respondis: “Ne, tigroj neniam manĝas leonojn.”

Tiam la leono estis ŝovita en la alian kaĝon, kaj la tigro tuj komencis treege salti al li.

La malfeliĉa Reĝo de Bestoj, pensante ke li estis mortigota, murmuris: “Ho! Sanktulo Patriko, gardu min!” “Ne timu,” diris la tigro, “mi ankaŭ estas Irlandano!”

G. C. LAW.

## ITALA FABLASCIENTO.

En Esperanto verkita de Clarence Bicknell.

Ne tre malproksime de mia urbeto, loĝas maljunulo okdekjara, tre bona kaj simpatis, kiun mi de multaj jaroj konis. Tre ofte li donis al mi la vulgarajn nomojn de la sovaĝaj kreskaĵoj, kiujn la pli junaj generacioj ne lernas, aŭ rakontas al mi la kredaĵojn kaj superstiĉojn de tempoj kiam li estis junulo. Kiel mi ne tuj notis tiujn ĉi, antaŭ ne longe mi decidis reviziti lin, por kolekti kelkajn el liaj interesaj rakontoj. Estas domaĝe ne kolekti tiajn fablojn (eble faktojn), tiel interesajn al la fabloscienculo, ĉar baldaŭ ili, kvankam ili mortas tre malrapide, malaperos. Jen estas du el la ses rakontoj, kiujn mi aŭdis.

(I.). Virino, amikino de la patro de mia amiko, loĝantino en la proksima vilaĝo, aliris nokte kaj malfrue al placo, la tagon aŭ la antaŭtagon de la *Memorigo de la Mortintoj*, tio estas, la duan aŭ la unuan de Novembro. Subite ŝi ekvidis procesion de multenombraj personoj, kiuj eliris el la preĝejo. Tiuj ĉi personoj, aŭ prefere fantomoj de mortintoj, tenis krucojn ĉe la manoj, kaj unu el ili prezentis al ŝi sian krucon, kiun ŝi akceptis, kaj metis en sian antaŭtukon. Reveninte hejmen, ŝi malfermis la antaŭtukon kaj trovis, ne krucon, sed kruroston de mortinto. Morgaŭ ŝi iris al bona pastro por konfesi sin, kaj rakontis al li la okazon. La pastro konsilis, aŭ ordonis, ke ŝi reiros saman lokon, por reatendi la alvenon de la procesio, sed kunportante en ŝia antaŭtuko katon-viron. Ŝi ankaŭ devos redoni la oston al tiu, kiu ĝin donacis. Tiun ĉi ŝi faris, kaj la persono, kiam li (aŭ ŝi) ricevis ĝin, diris: "Vi devas danki la Sinjoron, ke vi tenas en via antaŭtuko tion, kio ĉeestas; ĉar alie vi nun estus kun ni." Ŝi reiris hejmen, kaj malferminte la antaŭtukon, vidis la katon, mortan kaj rigidigitan.

Virino de mia urbeto, Bordighera, rakontis al mi preskaŭ la saman fablon, sed kun iom da diversaĵo, kaj la afero okazis en malsama vilaĝo. La vidantino de la procesio ricevis kandelon de unu, ĉar ĉiuj portis estingitajn kandelojn. Veninte domen, ŝi metis ĝin en la tirkeston de sia ĉambro. Dum la nokto ŝi vekigis. Aŭdinte ĝemojn kaj sopirojn ĉe la tirkesto, ŝi malfermis la meblon, kaj terurigite ekvidis la fingron de mortinto. Ŝi ankaŭ iris pastron, kaj ricevis similan konsilon. Kiam ŝi redonis la fingron, ŝi ekvidis ke, al la mano de la mortinto, unu fingro mankis.

(II.). Tiu ĉi estas tre interesa, ĉar la rakonto memorigas la legendon pri *Tannhäuser* kaj mi neniam aŭdis similaĵon. Mia amiko, kiam li estis junulo, kondukis sian ŝafaron al la malproksimaj mountherbejoj kie loĝas amiko kunpaŝtisto. Tiu

ĉi ofte revenis vespere tre malfrue, sed unufoje la ŝafoj revenis sen li. La nokto pasis, sed eĉ matene li ne vidigis. Tiam mia amiko kune kun parencoj de la perditulo, foriris serĉante lin, sed nenion trovis esceptinte lian bastonon, kaj la tranĉileton per kiu li kutimis skulpti figurojn aŭ literojn sur la ligno. Pasis kelkaj tagoj, sed la paŝtisto ne revenis. Tiam la amikoj iris al la pastro, kaj li respondis: "Kiam li revenos, ne demandu pri io, kion li faris dum la semajno de sia forestado."

Post ok tagoj, la paŝtisto revenis, kaj memvole rakontis pri la afero. Kiam li foriris, li kunportis sakon da salo por la ŝafoj, sed ili ne tute mangis ĝin; tial li enmetis la restaĵon en sian poŝon. Subite li trovis sin en vasta belega salono, mirege ornamita kaj lumigita, kie estis tre multe da ĉarmaj fraŭlinoj, kaj multe da mangaĵoj, kaj da trinkaĵoj. Tie li amuzis sin longatempes, sed fine enuite, li deziris foriri. Tiam la dancistinoj kaj aliaj diris al li: "Danku la Sinjoron ke vi enhavas poĉe iom da salo, ĉar sen ĝi, vi devigis resti kun ni."

Mia amiko ne dubas pri la vereco de tiuj ĉi, kaj de aliaj similaj fabloj, sed li diras ke nun la mondo estas ŝanĝigita. Kaj ankaŭ ke iu Papo de ne longe malbenis la feojn kaj la koboldojn, kiuj en la antaŭtempoj ofte amuzis sin, turmentante la Kristanojn. Nun ili ne plu estas potenculoj.

## HISPANAJ PROVERBAJ.

1. Korniko<sup>1</sup> diris al korvo "For de tie ci, nigrulo!"
2. Kiam amiko petis, ne estas morgaŭ.
3. Dio ne batas per du manoj.
4. Kiam unu pordo fermiĝas, cent pordoj malfermiĝas.
5. Tiu, kiu donacas al la publiko, donacas al neniu.
6. La piedoj de la ĝardenisto ne malutilas al la ĝardeno.
7. La vulpo estas ruza, sed pli ruza estas tiu, kiu kaptas ĝin.
8. Tiu, kiu bonfaras al vi, aŭ mortos aŭ foriros.
9. Tiu, kiu ne havas kapon, ne bezonas ĉapelon.
10. La saĝulo ŝanĝas siajn ideojn, sed la malsaĝulo neniam.

(4686).

<sup>1</sup> Carrion crow.N.B.—*Maltaj kaj Hindaj Proverboj poste aperos.*

[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 6906.]

(Vidu la kvar antaŭajn N-rojn.)

## AKTO I.

## SCENO 2 (daŭrigo).

- (Vokante). Servisto, venu! venu, Arielo!  
Mi estas tute preta: venu! venu!  
(Aperas Arielo).
- ARIELO.— Saluton al vi, granda mia mastro!  
Laŭ via bondeziro tuj mi venas.  
Ĉu flugi, naĝi, trafajriĝi, rajdi  
Sur nubaj volvoj miu vi nun devigos?  
Tuj Arielo agos.
- PROSPERO.— Ĉu, spirito,  
Vi kaŭzis la ventegon laŭ l'ordono?  
ARIELO.— Precize, mastro. Mi la reĝan ŝipon  
Enflugis: ĉu postparte, ĉu antaŭe,  
Ĉu sur ferdeko, ĉu en la ĉambretoj,  
Mirigon mi dissemis, ekbruligis  
Multegajn lokojn mi, per unu fojo;  
Ĉe l'masta pinto velojn kaj ŝnuraĵojn  
Videble mi flamigis; tiam, kune  
Interhigiĝis flamoj. Pli momentaj,  
Eĉ pli rapidaj ol la fulmotondroj,  
La flamoj, krakoj de l'sulfura muĝo!...  
Neptunon mem sieĝi eĉ mi ŝajnis,  
Kaj kun la ondoj la tridento tremis!
- PROSPERO.— Spirito brava! En tumulto tia,  
Sufiĉa por ŝipanojn frenezigi,  
El ili kiu povis agi saĝe?
- ARIELO.— Neniu; ĉiuj malsaĝuloj ŝajnis  
En malespera stato. Krom maristoj,  
Tuj subakvigis ili el la ŝipo  
De mi ekbruligita. La reĝido,  
Kun haroj starigantaj kiel kanoj,  
Unue maren ĵetis sin, kriante:  
"Infero certe estas nun malplena!  
"Ĉi tie nun la diablaro loĝas!"
- PROSPERO.— Bonege, Arielo! Ĉu proksime  
De l'lando ne fariĝis ŝippereo?
- ARIELO.— Proksime, mastro.
- PROSPERO.— Ĉu nun ĉiuj vivas?
- ARIELO.— Ne haro mankas, kaj iliaj vestoj  
Pli freŝaj vere ŝajnas ol antaŭe.  
Laŭ via volo ilin mi disigis  
Per bandoj travagantaj nun l'insulon,  
Kaj Ferdinando, la reĝido, sola  
De mi lasita, estas en angulo;  
Sopire, li l'aeron malvarmigas  
Kaj, tiel, brakokruciginte, sidas.
- PROSPERO.— La reĝan ŝipon, ankaŭ la maristojn  
De la ŝiparo, kiel vi disponis?
- ARIELO.— Savita estas nun la ŝipo reĝa  
Ankrita en la profundega golfo—  
De kia loko min, je l'noktomezo,  
Vi vokis iam por alporti roson  
El ventetiga Bermudinsularo—  
La ŝipo tie kuŝas. La ŝipanoj  
Miregigitaj, lacaj de penado,  
Sub la ferdeko nun sorĉarte dormas.  
Ceteraj ŝipoj kiujn mi disigis  
Interrenkontis sin, kaj Neapolon  
Malĝoje iras.—Ŝiparestro pensas  
Ke l'reĝan ŝipon li fundiri vidis,  
Kaj ke en mar' pereis la regnestro.
- PROSPERO.— Mision vian, Arielo, bone  
Plenumis vi; alia tamen ago  
Farota restas. Kia estas l'horu?
- ARIELO.— La posttagmeza.
- PROSPERO.— Du sabloŭtiloj  
Sin malplenigos ĝis la sesa horo:  
Ni dume devas bone tempon uzi.
- ARIELO.— Ĉu plie mi labori devas, mastro?  
Bonvolu vi memori la promeson  
Al mi faritan sed ne plenumitan.
- PROSPERO.— Ĉagrena? Kial do?
- ARIELO.— Min liberigu!...
- PROSPERO.— Ne antaŭ ol la tempo venos!
- ARIELO.— Mastro!  
Kompatu min, ĉar mi ja tre fidele  
Vin servis—ne mensogis—ne eraris...  
Vin servis senŝpareme, senmurmure,  
Kaj, mastro, vi promesis de plenjaro  
Rabaton.
- PROSPERO.— Ĉu, spirito, vi forgesas  
El kiaj turmentegoj mi vin tiris?
- ARIELO.— Neniam.
- PROSPERO.— Jes! vi ĉion nun forgesas.  
Ja ŝanceligos vin trapremi ŝlimon,  
Por mi sur akra norda vento rajdi,  
Aŭ vin trapuŝi en la frostan teron,  
Se tiel mi ordonos! Vi forgesas...
- ARIELO.— Neniam.
- PROSPERO.— Malbonulo, vi mensogas!  
Eĉ vi forgesas kiel Sikoraksu—  
Malpura sorĉistino kurbigita  
Per multaj jaroj kaj malbondeziroj—  
Agadis.
- ARIELO.— Mastro, ne!
- PROSPERO.— Ja vi forgesas.  
Nu, diru al mi kie ŝi naskiĝis.  
(Daŭrigo).

## MATEO FALKONE.

Eltiraĵo el Merimée, trakukita de ELISE BAUER.

Unu tagon en aŭtuno Mateo Falkone frue eliris kun sia edzino por viziti unu el siaj rutaroj en la maldensejo de la arbaro. Lia fileto, Fortunato, volis akompani lin, sed, ĉar la loko estis tro malproksima, kaj iu devis resti por gardi la domon, li rifuzis. Oni vidis ĉu li ne havis kaŭzon por penti pro tio. Li estis foririnta de kelkaj horoj, kaj Fortunato kuŝis je la suno, rigardante la blujajn montajn, kaj pensante ke, la venontan dimanĉon, li tagmanĝos en la urbo, ĉe sia onklo, la korporalo.

Tuj pafo interrompis lian meditado. Li ekleviĝis, kaj turnis sin je la flanko de la ebenaĵo de kie la bruo venis. Aliaj pafoj sekvis je malegalaj interspacoj ĉiam alproksimiĝante. Fine en la vojeto, kiu kondukis al la domo, aperis viro kun pinta ĉapo (kiel portas la montanoj) barba, kovrita per ĉifonaĵoj, pene trenigante kaj apogante sin sur sia pafilo. Li ĵus estis ricevinta pafon en la femuron. Tiu ĉi viro estis bandito, kiu, foririnte nokte por aĉeti pulvon en la urbo, estis falinta en embuskon de korsaj soldatoj. Post fortika defendo, li estis sukcesinta forkuri, vive persekutata. La soldatoj estis tre proksimaj, kaj lia vundo nebligis lin alveni en la arbaron, antaŭ liaj persekutantoj. Li alproksimiĝis al Fortunato dirante: "Vi estas la filo de Mateo Falkone. Mi estas Gianetto Sanpiero. La *flavaj kolumoj* persekutas min. Kaŝu min, ĉar mi ne povas plu marŝi." "Kaj kion diros mia patro, se mi kaŝos vin sen lia permeso?" "Li diros ke vi faris bone. Kaŝu min rapide, ĉar la soldatoj nun alvenas, kaj mi ne povas atendi, ĝis via patro revenos. Kaŝu min, aŭ mi vin mortigos." Kun la plej granda indiferenteco Fortunato respondis, "Via pafilo estas senŝarga, kaj ne estas aliaj kartoĉoj en via kartoĉujo." "Mi havas mian stiletton." "Sed ĉu vi kuras tiel rapide kiel mi?" Li faris salton, kaj forkuris. "Vi ne povas esti filo de Mateo Falkone. Ĉu vi do aŝtigitos min antaŭ via domo?" La infano ŝajnis kortuŝita. "Kion vi donos al mi se mi kaŝos vin?" La bandito serĉis en sia leda poŝo, kaj eltiris el ĝi moneron da kvin frankoj. Vidante la monon, Fortunato ridetis kaj diris: "Nenion timu." Li tuj faris grandan truon en amason da fojno apud la domo. Gianetto eniĝis tien, kaj la infano lin kovris tiamaniere, ke li lasis al li iom da aero por spiri. Estis tamen neeble suspekti viron kaŝitan sub la fojno. Plie li prenis katinon kun ŝiaj idoj, kaj placis ilin sur la amaso por kredigi ke ĝi ne estis tuŝita de kelke da tempo. Poste, ekvidante sangajn postsignojn, li zorge kovris ilin per polvo, kaj trankvile rekuŝiĝis je la suno.

Kelkaj minutoj poste, ses viroj en brunaj uniformoj kun flavaj kolumoj, komandataj de adjudanto alvenis. Tiu ĉi adjudanto estis iom parenca de Falkone (Oni scias ke en Korsujo oni sekvas la gradojn de parenteco pli malproksime ol aliloke). Li nomiĝis Teodoro Gamba, kaj estis agemulo, tre timata de la banditoj, el kiuj li jam estis kaptinta kelkajn.

"Bonan tagon, kuzeto, kiel vi grandiĝis," li diris. "Ĉu vi ĵus vidis pasi viron?" "Ho, mi ne estas ankoraŭ tiel granda, kiel vi, kuzo," naivege respondis la infano.

"Tio venos. Sed diru al mi ĉu vi vidis pasi viron kun pinta nigra ĉapo, kaj ruĝe kaj flave brodita ĵako?"

"Viron kun pinta ĉapo?" "Jes! respondu rapide, kaj ne ripetu miajn demandojn!" "Hodiaŭ matene la Sinjoro Pastro pasis antaŭ nia pardo sur sia ĉevalo Petro. Li min demandis, kiel sanas mia patro, kaj mi lin respondis—" "Ha, sentaŭgulo, vi estas ruzulo! Diru tuj al mi kien Gianetto iris, ĉar estas li, kiun mi serĉas; kaj mi estas certa, ke li prenis tiun ĉi vojeton."

"Ĉu oni vidas kiam oni dormas?" "Vi ne dormis, sentaŭgulo. La pafoj vekis vin." "Vi do kredas ke viaj pafiloj faras tiom da bruo! La pafilo de mia patro faras pli multan!" "Mi bone scias ke vi vidis Gianetton. Eble vi eĉ kaŝis lin! Kamaradoj, eniru en la domon, kaj vidu ĉu nia viro estas tie. La fripono havas nur unu piedon por marŝi, kaj li posedas troan bonsencon por provi atingi lamante la arbaron. Plie, la sangaj postsignoj finiĝis tie ĉi." "Kaj kion diros mia patro, kiam li scios ke oni eniris en lian domon dum lia forestado?" "Sentaŭgulo," diris la adjudanto, "ĉu vi scias ke mi havas rimedon paroligi vin aliamaniere? Eble vi fine parolos, kiam mi donos al vi dudekon da batoj per la glavoplado! Ĉu vi scias, fripono, ke mi povas kuŝigi vin en malliberejo sur la pajlo kun katenoj al la piedoj?" Sed la infano ne maltrankviliĝis.

La soldatoj estis vizitintaj la tutan domon. Tio ne estis tre longa afero, ĉar la dometo de Korso enhavas nur unu kvadratan ĉambbron. La meblaro konsistas el tablo, benkoj, kestoj, ĉasiloj kaj kuiriloj. Dume Fortunato karesis sian katinon, kaj ŝajnis ĝui la konfuzon de la soldatoj. Uuu alproksimiĝis al la amaso da fojno kaj vidis la katinon kaj donis baton per la bajoneto en la fojnon, plialtigante la ŝultrojn, kvazaŭ li sentas la ridindecon de sia singardo.

Nenio movis, kaj la vizaĝo de la knabo ne

montris ian maltrankvilecon. La adjudanto preskaŭ malesperis. Li jam serioze rigardis je la flanko de la ebenaĵo kiel inklina reiri tien de li venis, kiam li ekpensis ke eble karesoj kaj donacoj helpos lin. “Kuzeto,” li diris, “vi ŝajnas esti tre lerta bubo. Sed vi agas malbone ĉe mi, kaj se mi ne timus ĉagreni mian kuzon Mateon, vere mi forkondukus vin kun mi. Sed kiam mia kuzo estos reveninta, mi rakontos al li la tutan aferon, kaj li vin vipos por via mensogo. Estu bona knabo, kaj mi donos al vi tiun ĉi belan argentan horologon, kiu certe valoras tridek frankojn!”

“Kiam mi estas grandulo, mia onklo, la korporalo, donacos al mi horologon.” “Jes, sed la filo de via onklo jam havas unu, ne tiel belan, kiel tiun ĉi, vere. Li tamen estas pli juna ol vi.” Fortunato rigardis ĝin simile je kato, al kiu oni prezentas tutan kokidon. Sentante ke oni mokis lin, li ne kuragiĝas kapti ĝin, kaj de tempo al tempo, li deturnas la okulojn por ne subfali la tenton. Ŝajnis tamen ke la adjudanto volis vere donaci la horologon al li.

“Mi perdu miajn epoletojn,” ekkriis la adjudanto, “se mi ne donacos al vi la horologon, kondiĉe ke vi diru kie estas Gianetto. La kamaradoj estas atestantoj, kaj mi ne povas depreni mian promeson.” Tiel parolante li alproksimigis iom post iom la horologon, ĝis ĝi preskaŭ tuŝis la palan vangon de la infano. Oni vidis sur lia vizaĝo la internan batalon inter la avideco, kaj la respekto ŝuldata al la gastamo. Li pene spiris: Li preskaŭ sufokigis. Dume la horologo balanciĝis, turniĝis kaj kelkafoje eĉ tuŝis lian nason. Fine, iom post iom, la dekstra mano levigis al la horologo; liaj fingroj tuŝis ĝin, kaj ĝi tute kuŝis en lia mano, la adjudanto tamen ne ellasis la ĉenon. La cifreplato estis ornamita; la kovrilo nove polurita; je la suno ĝi brilis kiel fajro.

La tento estis tro granda.—Fortunato levis ankaŭ la maldekstran manon, kaj per la antaŭfingro li montris supre sian ŝultron la amason da fojno. La adjudanto tuj komprenis lin. Li ellasis la ĉenon. Fortunato estis la sola posedanto de la horologo.

La soldatoj tuj renversis la amason, kaj ĝi baldaŭ moviĝis, kaj sanga viro, kun stileto en la mano, eliris, sed, provante levigi, sia vundo ne permesis lin stari. Li falis. La adjudanto ĵetis sin sur lin, kaj elŝiris la stileton el lia mano. Tuj oni forte ligis lin, malgraŭ lia kontraŭbatalo.—Gianetto, kuŝita sur la tero kaj ligita kiel branĉaro, turnis la kapon al Fortunato, kiu alproksimigis. “Filo de . . .,” li diris pli malsate ol kolere. La infano ĵetis al li la moneron, kiun li estis doninta, sentante ke li ne plu meritas ĝin. Sed la kaptito ŝajnis ne vidi tiun movon. Tre kviete li diris al la adjudanto: “Mia kara Gambo, mi ne

povas marŝi; vi devas porti min en la urbon.” “Vi tuj kuros pli rapide ol kapreolo,” respondis la kruela venkinto; “sed estu trankvila. Mi estas tiel kontenta teni vin, ke mi volonte portus vin unu mejlon sen laciĝi. Plie, amiko mia, ni faros por vi portilon per branĉoj.” “Bone,” diris la malliberulo, “vi ankaŭ metos iom da pajlo sur la portilon, por ke mi estu pli senĝena.”

Dum la soldatoj okupis sin, unuj por fari specon de portilo, aliaj por bandaĝi la vundon de Gianetto, Mateo Falkone kaj sia edzino subite aperis apud la kurbigo de la vojeto, kiu kondukis al la arbaro. La virino antaŭmarŝis, kurbiĝata penige sub la pezo de grandega sako da kaŝtanoj, dum la viro trankvile sekvis, portante nur unu pafilon en la mano, kaj alian sur la dorso; ĉar estas relinde je Korso porti ian ŝarĝon krom siaj armiloj.

Vidante la soldatojn la unua penso de Mateo estis ke ili estas venintaj por aresti lin. Sed kial tiu ĉi ideo? Ĉu li malpacis kun la justeco? Ne, li ĝuis bonan famon. Sed li estis Korso, kaj montano; kaj estas iom da Korsoj, kiuj, esplorante la memoron, ne tie trovas ian peketon. Li do estis singarda, kaj prepariĝis por la defendo. “Edzino,” li diris al Giuseppina, “metu malsupren vian sakon, kaj pretigu vin! Ŝi tuj obeis. Li donis al ŝi la pafilon, kiun li portis sur la dorso, por ke ĝi ne ĝenu lin. Tiam li malrapide autaueniris al la domo, laŭlonge la arboj, kiuj borderis la vojon, kaj preta ĵeti sin, je la plej malamika movo, malantaŭ la plej grandan trunkon, de kie li povus pafi kaŝate. Lia edzino sekvis lin proksimege, tenante la duan pafilon, kaj la kartoĉujon. La ofico de bona edzino dum batalo estas ŝargi la armilojn de ŝia edzo.

Vidante Mateon tiamaniere alproksimigantan, la adjudanto estis en tre granda maltrankvileco. Se Mateo, li ekpensis, estus hazarda parenco de Gianetto, aŭ se li ostus lia amiko, kaj li volus defendi lin, la kugloj de lia paŭlo alvenus al mi tiel certe, kiel letero al la poŝto. Je tia ŝanceliĝo, li kurage decidiĝis antaŭeniri sole, kaj rakonti al Mateo la tutan aferon, parolante al li, kiel al malnova konato; tamen la mallonga interspaco inter li kaj Mateo ŝajnis al li longega.

“Nu, amiko mia,” li ekkriis. “Kiel vi sanas? Estas mi, Gamba, via kuzo.” Mateo, nerespondante, haltis kaj gentile plialtigis sian pafilon. “Bonan tagon, frato!” “Mi venis pasante por saluti vin, kaj mian kuzinon Peppina. Ni havis longan marŝadon hodiaŭ, sed ni ne devas plendi pri nia laciĝo, ĉar ni faris bonan kaptaĵon. Ni ĵus kaptis Gianetton Sanpieron.” “Estu Dio laŭdata,” ekkriis Giuseppina, “li ŝtelis nian kaprion la lastan semajnon!” Tiuj ĉi paroloj gojigis Gamba. “La fripono sin kiel leono defendis. Li mortigis unu el miaj soldatoj, kaj, nekontenta je

tio, li rompis la brakon al la korporalo Chardon—sed tio ne estas grava afero, li estas nur Franco:—Plie li kaŝigis tiel bone, ke la diablo mem ne estus povinta trovi lin. Sen la helpo de mia kuzeto Fortunato, ni neniam estus trovinta lin. Gianetto kaŝigis sub tiu ĉi amaso da fojno, sed mia kuzeto vidigis al ni la ruzon. Mi certe diros ĝin al lia onklo, la korporalo, por ke li sendu al li belan donacon por lia penado. Lia nomo kaj la via estos en la raporto, kiun mi sendos al la provincestro.”

“Malbena!” ĝemis tute mallaŭte Mateo.

Kiam ili alvenis al la domo, Gianetto jam kuŝis sur la portilo, preta por foriri. Vidante Mateon kun Gambo, li strange ridetis; tiam turninte sin al la pordo de la domo, li kraĉis sur la sojlon, dirante: “Domo de perfidulo.”

Nur homo certa morti estus kuragiĝinta elparoli tiujn ĉi vortojn. Tiro per stileto, kiu ne postulus ripetadon, tuj estus paginta tiun insulton. Mateo tamen nur metis la manon al la frunto, kiel viro premegita. Fortunato estis enirinta en la domon, kiam li vidis sian patron alvenantan. Li baldaŭ reaperis kun taso da lakto, kiun li prezentis al Gianetto mallevante siajn okulojn.

“For de mi!” ekkriis la malfeliĉulo kun tondra voĉo. Poste, turnigante al unu el la soldatoj: “Kamarado, donu al mi trinkaĵon!” La soldato metis sian botelon en liajn manojn, kaj la bandito trinkis la akvon, kiu donis al li viro, kun kiu li ĵus interŝanĝis pafojn! Tiam la adjudanto donis la signalon por foriri, kaj diris *adieu* al Mateo kiu ne respondis.

Cirkaŭ dek minutoj pasis antaŭ ol Mateo malfermis la buŝon. La infano malkviete rigardis, jen sian patrinon, jen sian patron, kiu, apogante sin sur sia pafilo, konsideris lin kun kolerega mieno. “Vi komencas bone,” fine diris Mateo kun voĉo kvieta, sed terura por tiuj, kiuj lin konis. “Paĉjo mia,” ekkriis la infano, alproksimiĝante, la okulojn larmplenajn, preta sin ĵeti genue. Sed Mateo kriis al li: “Malantaŭen de mi!” kaj la infano haltis kaj ploregis, senmove starante kelkajn paŝojn de sia patro. Giuseppina alproksimiĝis. Ŝi ĵus ekvidis la horologĉenon elpendantan el lia ĉemizo. “Kiu donis al vi tiun ĉi?” “Mia kuzo, la adjudanto.”

Mateo ekprenis la horologon kaj, ĵetante ĝin forte kontraŭ ŝtonon, disrompis ĝin en mil pecetojn.

La ploregoj de Fortunato duoblogis, kaj Mateo daŭrigis lin fikse rigardi per siaj linkaj okuloj. Fine li frapis la teron per la pafilo, kaj ĵetinte ĝin sur la ŝultron, li reprenis la vojon al la arbaro, kriante ke Fortunato lin sekvu. La infano obeis. Giuseppina kuris post Mateon, kaj ekprenis lian brakon: “Li estas filo via” diris ŝi, tremanta, kaj fiksante siajn nigrajn okulojn sur tiujn de sia edzo, kvazaŭ ŝi volis legi tion, kio pasigis en lia animo. “Lasu min,” respondis Mateo. “Mi estas lia patro.” Ŝi kisis sian filon, kaj reeniris plorante en la domon, kie ŝi fervore preĝis antaŭ la imago de la Dipatrino.

Apud malgranda valetto Mateo haltis. “Fortunato, iru apud tiun larĝan ŝtonon.” La knabeto faris tion, poste li genufleksis. “Diru viajn preĝojn!” “Patro mia, Paĉjo, ne mortigu min!” “Diru viajn preĝojn! ripetis Mateon, teruravoĉe. Balbutante kaj ploregante, la infano diris la Patron kaj la Kredon. Fortavoĉe la patro respondis *Amen* je la finigo de ĉiu preĝo.

“Ĉu tiuj ĉi estas ĉiuj preĝoj kiujn vi scias?”

“Patro, mi ankaŭ scias la *Ave Maria*, kaj la *Litaniojn*, kiujn mia onklino lernigis al mi.”

“Ili estas tre longaj, sed diru ilin!”

La infano finis la litaniojn per malfortega voĉo.

“Ĉu vi estas fininta?”

“Ho! Patro mia, pardonu min. Mi neniam reparos ĝin. Mi tiome petegas mian kuzon, la korporalon, ke oni pardonu al Gianetto.”

Li estis ankoraŭ parolante kiam Mateo murmuris: *Dio vin pardonu!*

Li pafis, kaj Fortunato falis teren, morta.

Sen ĵeti rigardon sur la malvivulon, Mateo reiris domon, por serĉi fosilon por enterigi sian filon. Post kelke da paŝoj, li renkontis Giuseppinan, alkurantan, maltrankviligitan per la pafado. “Kion vi faris?” ŝi ekkriis.

“Justecon!”

“Kie li estas?”

“En la valetto. Mi lin enterigos. Li mortis Kristane. Mi kantigos mason por li. Oni diru al mia bofilo ke li venu loĝi kun ni.”

### TOM BOLIN. (Dibdin.—Tradukis A. Motteau).

Senviva kuŝas nun Tom Bolin,  
Karulo de l'ŝipar';  
Ventego ne plu blovos sur lin  
En granda mortintar'.  
Li staris en beleco vira,  
De la marist' model';  
Ferdeke devosklavo vera,  
Sidant' nun super vel'. (bis).

Tom ĉiam sian vorton gardis  
Kaj kore donis sin;  
Edzinton virtan li posedis,  
Amikojn verajn, nin.  
Li ankaŭ kantis tiel bele,  
De l'ŝipo Filomel'!  
Bedaŭru ni do lin fidele,  
Zorgantan super vel'. (bis).

Veteron belan sendos tamen  
La supervol' al Tom,  
En tago kiam venos hejmen  
Maran' kaj landa hom'.  
Ŝipanon, reĝon morto kaptas;  
Se li nun homa ŝel'  
Senmova korpo sube restas,  
Tom vivas super vel'. (bis).

## DIVERSAJ AVIZOJ.

Niaj Germanaj Samideanoj baldaŭ komencas sian propagandon, kaj eldonigis bonan broŝureton kiu kostas dekkvin pfenigojn kaj kiu multe helpos je la varbado de rekrutoj.

Sinjorino Phelps, Prezidantino de la Braillea Korespondada Klubo, anoncas la fondon de Esperanta sekcio. Ni rememorigas niajn blindajn amikojn ke Sinjoro W. P. Merrick, The Manor Farm, Shepperton, klopodas pri la movado, kaj estas la Braillea Sekretario de The London Esperanto Club.

Alilanda Adepto, kiu enpresigis sian nomon en nian Adresareton, kiel kolektanto de ilustritaj poŝtkartoj, ĵus estas skribinta: "Ĉu vi scias ke per, kaj por, via gazeto mi faras kaj estas ankoraŭ fariunta grandaron da poŝtkartoj ilustritaj? Ĉiutage la leteristo lasas en mia domo kvar, kvin, aŭ ses, ĉiuj skribitaj tiamaniere: "Leginte vian anoncon en The Esperantist k.t.p."

Mi ĉiam pensis, ke tiuj ĉi multe helpus nian aferon, kaj sendube la kolekto de poŝtsignoj ankaŭ estas inda je atento. Al ĉiu, kiu sendos ĉi tie sian nomon kaj adreson, por ke ĝi enmetiĝu en nian adresareton, kiel kolektanto de poŝtsignoj, kaj kiu kunsendos la necesajn ses pencojn (70 centimojn), la Redaktoro tuj resendos areton da almenaŭ dek diversaj poŝtsignoj. Kaj ĉiuj el ili estos per Esperanto ricevitaj. Estas mirinde kiom da alilandaj abonantoj tiun ĉi malgranda Gazeto jam posedas. Estos granda helpo al tiu ĉi afero se la abonantoj en Java, Pahang, Cochinchina, Japan, Trinidad, Barbados, Brazil, Mexico, Sierra Leone, China k.t.p. afable sendos aron da senvaloraj (al ili, sed ne al ni) specimenoj por ke ni disdonu ilin inter niaj apogantoj. *Per malgrandaĵoj oni grandaĵojn efektiviĝos!* Tial mi multe konfidas je poŝtkartoj kaj poŝtsignoj, por rapidigi la universalan alprenon de Esperanto.

Kelkaj amikoj tre amas *kronikon*; sed la Redaktoro petas ke ili sin turnu al la *Lingvo Internacia*, *L'Esperantiste*, k.t.p. por ĝin trovi. Tamen en tiu ĉi numero li donas mallongan skizon pri la agadoj de la pasinta monato. Multaj paroladoj estas farintaj. *The Associated Teachers' Guild*, *The Central Technical College*, *The Sir John Cass Technical Institute*, *The Westbourne Chapel* en Londono, kaj kunvenoj ĉe Sheffield kaj Nottingham atŝskultadis kaj eĉ interesiĝis je la Esperanta celo. Multaj artikoloj pri Esperanto aperis en la gazetaro.

Bonaj leteroj enpresigis en *The Hexham Herald* kaj *The Scottish Cyclist*. Malfeliĉe *The Daily Paper*, kiu donis al ni tiom da espero kaj helpo, estas mortinta, ĉar nia fervorega amiko Sinjoro Stead ne

povis plu zorgadi pri ĝi. Tamen nia movado ŝuldas al li ankoraŭ pli koregan dankesprimon. Pri la artikolo en la *C.T.C. Gazette* mi jam estas skribinta.

Mi ne povas nomi ĉiujn el la Anglaj Gazetoj, kiuj enhavis Esperantajn artikolojn, sed mi ne devas forgesi la novan monatan revuon, *The Crank*, kies dua numero enhavis tre valoran artikolon, skribitan de nia agema *Librarian*. Dua artikolo kredeble sekvos en la tria numero.

Sed estas inter la alilanda gazetaro ke ni trovas la plimulton da niaj apogantoj; kaj mi prenas la nunan okazon por danki la multajn samideanojn, kiuj afable sendadas al mi siajn lokajn gazetojn. En *La Plume Stenographique de France* troviĝis longan skizon; kaj ankaŭ tre longan nomaron da aliaj gazetoj oni povus citi. En la Amiens' a ĵurnalo mi legis ke la sindonema Sinjoro Tessencourt, la tiea Prezidanto, farigis konsulo de la Unuigitaj Ŝtatoj. Espereble la lingvo internacia helpos lin, kvankam ĝis nun ne estas multe da kunbatalantoj tie.

Tamen, antaŭ kelkaj tagoj, mi ricevis sekvantan leteron el tiu ĉi antaŭtemega lando. "When I was in business in New York I had considerable correspondence with merchants in various parts of the world, as I was a large buyer of raw goods from Siberia, South Africa, Central America, and other countries, and I felt the need of an international business language. With this feeling I paid some attention to *Volapuk* and *Spelin*, the two previous attempts at this problem which seemed worthy of notice, but I felt no confidence in there being any future in either of them. With regard to Esperanto I have a very different feeling, and think it is going to be a success."

Por fini tiun ĉi avizaron, mi deziras altiri la atenton de la legantaro al la ĵuseldonita tre interesa raporto pri la *Esporo de la Groupe Esperantiste de Lyons*. Tiu ĉi energia centro sendis leterojn je la komenco de 1903 al ĉiuj konataj grupoj, petante respondojn je kelkaj demandoj. La rezultato de tiu ĉi interesa afero nun aperas en la komenco de la Jan Lingvo Internacia. Mi elĉerpos kelkajn frazojn el tiu ĉi raporto pri la enhavo de la sescent da ricevitaj respondeletoj: (1) Esperanto estas de nun disvastigita en la plej granda parto de la Eŭroplingvaj landoj. (2) Plej ofte fremdaj Esperantistoj staras izolitaj unuj de la aliaj. (3) Kenio estas pli diversa ol la socialaj situacioj de la Esperantistoj. (4) Ke la facileco per kiu ili akiris Esperanton estis apenaŭ nekredebla, kia ajn estas la gepatra lingvo. Ni ĉiuj devas dankegi la Lionan Grupon pro ĝia granda laboro, kaj pro la grava rezultato kiu ĝin kronis.

## CORRESPONDENCE NOTES.

A.J.H. (Shrewsbury) writes: "There are many ways of spreading the language, but two plans, which I have not yet seen in print, appeal to me. (1). Let merchants, especially those with a world-wide business, adopt Esperanto names for their goods. (2). Cause Esperanto to be included among the languages in which it is permissible to send telegrams."—In thanking A.J.H. for the kind suggestions, and hoping that many will follow his good example, we beg to note that the second of these plans is already in vogue, as the writer has seen several Esperanto telegrams, of course minus the accents. As to the first, it is a capital suggestion. A certain perfume (*Espero*) has been advertised in this gazette, and, in consequence, the proprietor has had many orders from France and other foreign strongholds of our Cause. The opening up of a universal market for one's goods is the first advantage of the study, from a business man's point of view, and I trust that ere long it will be largely made use of by our growing army of Esperantists.

L.R.C. does not know Spanish, yet, thanks to Esperanto, he was able to translate the sentences in that language in our February number. Are we to consider therefore that Spanish resembles Esperanto more closely than Italian, or has some other friend, equally ignorant of that tongue, been able to translate the Italian sentences on page 57?

Several friends have pointed out the word given in the new English-Esperanto Dictionary for *Editor*. We prefer to use *Redaktoro* to translate the term, and use *Eldonisto* for *Publisher*.

E.M. (Lancaster) sends an excellent suggestion. He writes: "Will not some good Esperantists consent to correct one beginner's letter per week, provided that an envelope be enclosed for the reply?"—Surely there must be many who are

willing to undertake this light work, and who thus will improve their own knowledge, and will also make the study especially interesting for country students. The Editor will be glad to find a learner, or a teacher, as may be desired.

Several subscribers have pointed out that the meanings of some words not in the text-book vocabulary have not been explained. As the Esperanto-English Vocabulary is now issued, we shall only explain words not to be found in that comprehensive little work.

No. 8380 writes: "Sir, permit me briefly to call attention to two of the examples given last month in illustration of the uses of the preposition 'By.' (1). *He was holding him by the neck with both hands.* Neck: part of the body, or instrument by which B is held; hands: part of the body by which A holds B. The preposition should, therefore, in my opinion be '*Per*.'" (In the first case there is a certain amount of ambiguity, and *je* or *per* can be used indiscriminately). "(2). *The little boy returned home quite by himself.* This somewhat peculiar idiom obviously means that the child returned alone, and must be rendered thus '*La knabeto revenis domon sole.*'" The Editor nearly altered the latter phrase to the more colloquial expression "*The little boy returned home quite on his own.*" It seems to mean "*by his own instrumentality,*" and "*per*" certainly seems to be correct in this instance. He might, for example, have just commenced to walk, in which case the proud mother would no doubt have used the given phrase, even if she had accompanied him every step of the way (which, in the Editor's opinion, she probably did). As the phrases seem to give a considerable amount of instruction, the same contributor has kindly treated in this issue the prepositions "IN and INTO."

## IN, INTO.

Many birds fly in the autumn into warmer countries.

When the mouse runs indoors.

The women run about indoors.

"They are quite right, in my opinion.

They were brought up in the fear of God.

Multaj birdoj flugas dum la aŭtuno en plivvarmajn landojn.

Kiam la muso kuras en la domon.

La vorinoj kuradas en la domo.

Laŭ mia opinio, ili estas tute pravaj.

Ili edukigis laŭ la timo al (aŭ je) Dio.



In the education of children, it is necessary to use—

She had difficulty in expressing her thoughts.

Matrimony, a fact in the life of Henry VIII.

He is the best in the world for that.

I think I did well *in* acting thus.

Alike in face and character.

We are going away in two or three days.

Something, in the shape of a man, appears.

They stand in one long line.

While walking in the street I fell.

George Washington was born in the year one thousand seven hundred and thirty-two, and never told a lie.

*Por* la edukado de la infanoj, estas necese uzi—

Ŝi havis malfacilecon *por* esprimi siajn pensojn.

Edziĝo, fakto de la vivo de Henriko VIIIa.

Li estas la plej bona pri tio *el* la mondo.

Mi pensas, kemi bone faris tiel aginte.

Similaj *per* la vizaĝoj kaj la karaktero.

Ni foriros *post* du aŭ tri tagoj.

Io, *sub* la formo de homo, aperas.

Ili staras *sur* unu longa linio.

Promenante *sur* la strato, mi falis.

George Washington estis naskita la jaron mil sepcent tridek duan, kaj mensogis neniam.

At the request of many Subscribers, the Grammatical synopsis has been omitted from this issue, and the interesting narrative of the early days of Esperanto takes its place.

All Members of the London Esperanto Club whose numbers are lower than 136 are hereby reminded that their renewals are now due, and should be sent to the Hon. Secretary. A Renewal Form was enclosed in the January Number.

Subscribers are reminded that THE ESPERANTIST appears at the beginning of each month.

As the Editor will be abroad during the end of March, it is hoped that friends will excuse delay in replies to letters. The April gazette should appear on the first of the month as usual, notwithstanding.

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Librarian, P. Howard, Esq., The Bungalow, Cranes Park, Surbiton, Surrey.

The books most read are:—

“Student’s Complete Textbook,” by J. C. O’Connor, B.A., 1s. 8d., post free (revised edition).

“Thirty five Exercises with Keys,” by A. Motteau, 1s. 3d., post free (6 copies for 6s. 6d.).

“No. 52,” a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d.

Fundamenta Krestomatio; Dr. Zamenhof, 3s. 4d.

“Hamlet,” translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Stories from back “L’Espérantistes,” 2d. each.

“Tourist’s Phrase-Book,” in 6 languages, 6d.

Esperanta Sintakso de P. Fruictier, 1s. 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are:—

“La Lingvo Internacia,” printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

“L’Espérantiste,” in French and Esperanto, 4s.

“La Lumo,” in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

“La Belga Sonorilo,” in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

“La Bohema Esperantisto,” in Czech and Esperanto, 3s.

“La Rondiranto,” in Bulgarian and Esperanto, 3s.

The new “Internacia Medicina Revuo” will appear every two months. Subscription 6s. 6d. per annum.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries, 2s. 6d. each.

“French-Esperanto Vocabulaire,” 2s. 6d.; “Esperanto-French Dictionnaire,” 1s. 6d.

“Braille Instruction-Book for the Blind,” 4s.

Translation of the above into English, 6d.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.

ELTIRO EL PRIVATA LETERO DE  
D-RO ZAMENHOF AL S-RO B.,

Presita kun permeso de ambaŭ korespondantoj, en Jaro 1896.

Tradukis el lingvo rusa V.G.

. . . Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto, de la momento de ĝia naskiĝo, ĝis tiu ĉi tago? La tuta *publika* historio de la lingvo, t.e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al Vi pli malpli konata; cetero *tiun ĉi* periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al Vi tial en komunaj trajtoj sole la historion de la *naskiĝo* de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al Vi ĉion, tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis; la ideo, al kies efektivigo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi—estas ridinde ĝin diri—en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al Vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi, kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi ŝanco donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj nacioj: Rusoj, Puloj, Germanoj kaj Hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn. Tie pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco, kaj konvinkigas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion, kaj dividas ĝin en malamikaj partoj.

Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj en la domo, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke *homoj* ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Puloj, Germanoj, Hebreoj k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multoj eble ridetos pri tiu ĉi "doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj" posedis ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkigis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentigas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn

## THE BIRTH OF ESPERANTO.

Freely translated, from an Esperanto version of a Private Letter of Dr. Zamenhof written in Russian, by John Ellis.

“ . . . You ask me how it was that the idea of creating an international language occurred to me, and what was the history of the Esperanto language from the time of its birth till to-day? The entire public history of the language, that is to say, beginning from the day when I gave it to the world, is more or less known to you; further, it is not opportune now, for many reasons, to touch upon that period; I will consequently relate to you, in general lines, merely the story of the birth of my language.

“ It would be difficult for me to tell you all this in detail, for much of it I have myself forgotten. The idea, to the realisation of which I have dedicated my whole life, struck me (it is ridiculous to mention it) in my earliest childhood, and from that time never left me. This circumstance will partly explain why I have laboured upon the matter with so much determination, and why, in spite of all difficulties and hardships, I have not abandoned the idea, as many other working in the same field have done.

“ I was born in Bielstock, in the department of Grodno (Russia), where I spent the days of my boyhood. This fortuitous circumstance determined the direction of my future ambitions, for the inhabitants of Bielstock are of four different nationalities—Russians, Poles, Germans, and Jews—each of which speaks a separate language, and is on bad terms with the others. There, more than anywhere else, an impressionable nature feels the heavy misfortune of diversity of tongues. One is convinced at every step that the diversity of language is the only, or at least the chief, cause which separates the human family and divides it into inimical sections.

“ I was brought up as an idealist. I was taught that all men are brothers; meanwhile in the street and at home everything, at every step, compelled me to feel that *humanity* does not exist, that there are only Russians, Poles, Germans, Jews, etc. This thought ever deeply troubled my boyish mind—although many may smile at the thought of a lad sorrowing for humanity. But at that time it seemed to me that the ‘grown ups’ possessed an almighty power, and I said to myself that when I was grown up I would utterly dissipate this evil.

“ Little by little I became convinced, of course, that these things were not so practicable as in my boyhood I had imagined; one by one I cast aside

utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj.

Kiam el la Bjelostoka gimnazio mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke me iam veturados en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklindos la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla, kaj mi komencis malklare revii pri *nova*, arta lingvo. Mi ofte komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k.t.p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da-gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, kaj dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: "for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj,"—kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj Francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi lingvon Anglan, la simpleco de la Angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank' al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj Latina kaj Greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵajn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo "Švejcarskaja," kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo "Konditorskaja." Tiu ĉi "skaja" ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

my various childish utopias, but the dream of one single tongue for all mankind I never could dispel. In a dim fashion, without any defined plan, in some way it allured me. I do not remember when, but, at all events, it was very early, I arrived at the consciousness that an international language was possible only if it were neutral and belonged to none of the now-existing nationalities.

"When I passed from the Bielstock Gymnasium<sup>1</sup> to the Second Classical School of Warsaw, I was for some time seduced by the dead languages, and dreamed that some day I would travel throughout the world, and in flaming words persuade mankind to revive one of these languages for the common use. Subsequently, I do not now remember how, the conviction came to me that that was an impossibility, and I began, indistinctly, to dream of a new and artificial language. I often made attempts, inventing a profusion of declensions and conjugations, but the language of man, with, as it seemed to me, its endless mass of grammatical forms, its hundreds of thousands of words and ponderous dictionaries, appeared to be such a colossal, and yet tricky, machine that many a time I exclaimed—'Away with dreams! this labour is beyond human powers!' But, in spite of all, I always returned to my dream.

"In childhood (before I could make comparisons or work out conclusions) I had learnt French and German, but when, being in the 5th class of the gymnasium, I began to study English, the simplicity of its grammar flashed upon my comprehension, thanks, chiefly, to the wearisome ploughing through the Greek and Latin grammars. I observed that the rich wealth of grammatical forms was not a necessity, but merely the blind result of accidental history. Under that influence I recommenced my research into language, and discarded the unnecessary forms, and I noticed that the grammar ever and ever melted under my hands, and soon I arrived at a tiny grammar, which, without causing any disadvantage to the language, occupied only a few pages. Then I began to devote myself to my dream more seriously. Still, the giant dictionaries left me no peace of mind.

"One day, when I was in the 6th or 7th class at the gymnasium, my attention was, by chance, turned to the sign 'Švejtšakaja' (drink-shop), and close by to the sign 'Konditorskaja' (sweet-shop). Although I had seen it many times before, this 'skaja' aroused my interest, and showed me that by means of suffixes I might make one word into others, which need not be separately learned. This thought took complete possession of me, and all at once I felt the ground beneath my feet. A ray of light had fallen upon the terrific giant dictionaries, and they began to shrink rapidly before my eyes.

"La problemo estas solvita!"—diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj, kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. "patrino," "mallarĝa," "tranĉilo," k.t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn *formitajn* kaj malaperi el la vortaro La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

(*Finigota en la proksima numero*).

"'The problem is solved,' I cried. I seized this idea of suffixes, and began to work hard upon it. I understood how important it was to make full use of this power—which, in natural languages, plays only a partial, blind, irregular and incomplete rôle—when consciously creating a new language. I began to compare words, to examine their constant and defined relationships, and every day I cast out from the dictionary a fresh vast series of words, substituting for this mass a single suffix, which signified a certain fixed relationship. I next remarked that a great number of words, hitherto regarded purely as 'roots' (such as 'mother,' 'narrow,' 'knife'), might easily be treated as 'formed words,' and disappear from the dictionary. The mechanism of language stood before me as though it were upon the palm of my hand, and, inspired by love and hope, I began to work systematically. After that I soon had the entire grammar and a small dictionary in manuscript."

<sup>1</sup> School preparatory for the University.

## NIAJ LIBERTEMPOJ.

Sinjoro H. Voituret (delegito de la Touring Club de France) skribis al mi "La tute admirinda lando, loĝita sur la limoj de Francujo kaj Svisujo, nomata Jura, estas ne sufiĉe konata de alilandaj turistoj." Mi deziras danki lin pro lia sciigo ĉar ĝi memoras al mi unu el la plej grandaj plezuroj de la mondo, la turismon biciklete. Eble multe da miaj legantoj nun ekpensadas siajn libertempojn, kaj proponas iri en regionojn ĝis nun nekonatajn, kie ili povos renkonti diverslandajn gesamideanojn. Mi mem intencas tiun ĉi fari, kaj mi plezure donos sciigojn al ĉiuj, kiuj ilin petos, pri la alilanda bicikleta turismo. Mi ĝoje memoras la plezuregajn impresojn kiujn faris je mi la belaĵoj de tiu ĉi ĵusnomita Jura, kaj la apuda Departemento de l'Ain. Dum la pasinta Majo mi faris vojaĝon de dumil kilometroj, kun mia patro, kaj vidis multajn el la plej belaj regionoj en Francujo, Svisujo, Italujo, Germanujo kaj Belgujo per biciklete. La plezuro vero estis plezurego. Sed tiatempe mi ne konatiĝis kun Esperantistoj; kaj mi prezentas al mi ke la sama vojaĝo nun estus pli ol plezurplenega, ĉar mi konas la adresojn de multaj Esperantistoj, kiuj deziras paroladi Esperante kun ni, anoj de alia, sed tamen, tre proksima lando. Se iaj el vi, gelegantoj miaj, deziras ricevi kelkajn el tiuj ĉi adresoj, mi sendos ilin al vi; kaj mi estas certa ke vi neniam bedaŭros ke vi estas fidintaj je Esperanto por plezurpleni viajn libertempojn. Por turistoj, la granda helpo, kiun donas kono de la lingvo internacia vere estas

neforgesinda. Per ĝi, vi povas lerni multe da interese-gaj aferoj, kiujn alie vie tute ne eltrovus. Mi skribas tiujn ĉi liniojn hodiaŭ ĉar la libertempoj jam alproksimiĝas. Mi ĉiam pliamas la longajn tagojn de la printempo al la varmegaj, kaj ofte polvplenaĵoj, tagoj de la someraj monatoj. Tiel mi preskaŭ ĉiam elektis la Junian monaton por bicikleta vojaĝo inter la belaĵoj de mia propra lando, aŭ, pli bone, inter la montoj kaj lagoj de pli malproksimaj landoj, kie troviĝas bonegaj vojoj, kaj kie la ĉiutaga vivado estas tiel malsama je la nia. Sed sendube multaj el ni Esperantistoj deziras forvojaĝi eĉ pli frue. Eble kelkaj el ni jam estos foririntaj antaŭ la Pasko, kaj ĝia Aprila ESPERANTIST. Al ĉiuj, kiuj povas, mi kore konsilas vojaĝi alilande, kaj persone provi la helpon, kiun la lingvo internacia donos.

Tamen mi havas duan, kaj ne malindan celon. Multaj el vi sendube estas anoj de la fama *Cyclists' Touring Club*. Kaj vi jam scias ke la *Touring Club de France* estas la plej notinda helpanto de nia kara afero et Francujo. Nu, ĉu la C.T.C. ne devas ankaŭ klopodi pri Esperanto? Mi ĝin kredas, kaj mi fidlas, ke antaŭ ne longe, ĝi faros ion por la afero. En la *C.T.C. Gazeto* de tiu ĉi Marta monato, troviĝas artikolo pri la lingvo, kaj mi fervore petegas, ke ĉiuj la Esperantistaj membroj de la C.T.C. skribu al la Redaktoro de ĝia Gazeto, kaj diru ke ili estas interesitaj, kaj ke ili esperas ke la C.T.C. klopodos pri Esperanto, same kiel la I.C.F. jam estas farinta. Tionfarante, ĉiuj multe helpos nin, kaj gajnos koregan dankesprimon de la tutmonda Esperantistaro.

LA REDAKTORO.

## LA LINGVO DE LA FLOROJ.

Originale verkita de Ben Elmy.

Mi ne intencas paroli pri la tiel nomata floringvo, per kies helpo timemaj amantoj iam kuraĝis malkovri la flamon de kaŝita pasio. Tiu ĉi lingvo nur estis sistemo de silentaj signaloj; ekzemple, la sopiranta ĉielblua Ne-min-forgesu; la modesta Violo de espero; la delikatodora Resedo<sup>1</sup> anoncanta ke "Miaj ecoj superas miajn ĉarmojn"; la Rozo ruganta, emblemo de simpatio reciproka. Mi tute lasos tion ĉi al la junuloj de la brula Oriento, kie, oni diras, la fiktiva floringvo fariĝis sperta sciado, kvankam nur iom komisiita al la vulgara kaj malvarma nigro-kaj blanko de libroj presitaj.

Sed en tia lingvo, la floroj nur utiligas kvazaŭ senvolaj iloj por esprimi ian senton aŭ sciigon sole homan. Mi, do, plivolas pensi kaj pensi pri la lingvo kiun uzas la floroj mem, por sciigi siajn proprajn dezirojn kaj bezonojn al aliaj vivaj estaĵoj; ĉu insekto, ĉu birdo aŭ besto, ĉu eĉ la homo ankaŭ. Ĉe multe da belaj floroj sia rasdaŭrigo mem dependas de la apudesto de tiaj fremdaj kunhelpantoj.

Tamen la floroj—kun siaj postfruktoj ne posedas vortojn aŭ eĉ sonojn en sia lingvo; efektive, tio ĉi estas ankoraŭ nur "sistemo de silentaj signaloj"; koloro, formo, odoro, gusto—jen estas la solaj rimedoj de la floroj por altiri la insektojn kiuj interfruktigos la geflorojn, kaj la birdojn aŭ bestojn kiuj poste forportos kaj dissemos la semojn. Deligitaj de iom da mielo, la abeloj, papilioj, favoj, muŝoj, aŭ skarabetoj, fariĝas ambasadoroj de amo inter la senmovaj gefloroj; kaj rekompencitaj de bongusta frukto, la birdoj aŭ bestoj fariĝas portantoj de semoj, nuksoj, kernoj,—kies sufiĉa proporcio enteriĝos fine en tero freŝa, malproksime de la parencaj floroj.

Sendube la diferenca konstruaĵo kaj ecoj de la

diversaspecaj floroj servas speciale por alvoki al tiuj ĉi la plej decajn kaj taŭgajn senditojn, ĉu de la amo, ĉu de la propagando. Ankaŭ estas fakto-alcertiga, ke tiaj floroj kiaj bezonas nur la venton por efektigi sian fruktigon, ĉiam estas floroj nerimarkindaj pro koloro, formo, aŭ odoro; kaj neniam kreas mielon.

Ĉu la floroj aŭ kreskaĵoj havas ian konsciencan aŭ propran volon, je siaj agoj aŭ funkciadoj? Ĉu vere "la kverko tremetas ĉe la unua bato de la hakilo" kiel kantas la poeto? Antaŭ nelonge la botanikistoj kutimis diri ke ĉiuj agoj de la floroj estas nur funkciadoj aŭtomataj, sen propra volo aŭ inteligento de la floro mem. La avo de la fama Charles Darwin estis, ŝajne, la unua observanto kiu kuraĝis pensi kaj diri ke la kreskaĵoj posedas ion analogian je la instinkto aŭ prudento de la vivuloj bestaj. Post nur iom da jaroj, Wordsworth ankaŭ diris:—

"Mi certe kredas—ĉiu kara flor'  
Ĝuadas la aeron kiun spiras."

Charles Darwin mem plibonigis kaj tre certigis la temon de sia avo; kaj, en nunaj tagoj, Dro. J. E. Taylor verkis plej interesan kaj mirandan libron pri la "Sagaceco kaj Moraleco de la Kreskaĵoj." Mi devus ankoraŭ citi multe da verkistoj, anglaj kaj alilandaj—Shelley, Tennyson, Lowell, Jefferies, Flammarion, Maeterlinck, Karr, k.t.p., sed mia spaco jam estas plenigita. Eble, ĉe estonta okazo, nia estimata Redaktoro permesos ke mi skribu iom plu pri tiuj observemaj verkistoj, kiuj havis koron por atskulti, kaj cerbon por kompreni, la silentan paroladon de niaj humilaj gefratoj, la floroj.

BEN ELMY.

<sup>1</sup> Mignonette.

## DU FABLOJ DE LAFONTAINE.

*La Korvo kaj la Vulpo.*—Belega korvo, sur arbo sidanta, tenis en sia beko fromaĝon. Vulpo altirita de la bonodoro, diris al li: "Nu! Bonan tagon, Via Korva Moŝto! Kiel bela vi estas! Kiom vi ŝajnas al mi belega! Mi ne volas mensogi; se via voĉo estas tiel bela, kiel estas via vestaĵo, vi estas la Fenikso el la loĝantoj en tiuj ĉi arbaroj."

Ĉe tiuj ĉi vortoj, pro ĝojego eksaltis la korvo, kaj, por atdigi sian belsonan voĉon, li larĝe malfermis sian bekon, kaj preterlasis sian fromaĝon.

Tuj ekkaptis ĝin la vulpo kaj diris: "Mia bela sinjoro! Sciigu ke ĉiu flatulo vivas per la aferoj de tiuj, kiuj kredas je li. Tiu ĉi leciono sendube egalvaloras fromaĝon."

La korvo, hontanta kaj konfuza, juris (sed iom tro maltrue) ke de nun, neniu trompos lin.

*La Garolo kaj la Plumoj de la Pavo.*—Pavo ŝanĝis plumojn: Garolo pronis ilin, kaj per ili sin vestis. Poste li aliris por promenadi, tre fiero, inter aliaj pavoj. Li kredis ke li estis eminentulo! Iu rekonis lin; ĉiuj lin mokis, kaj strangmaniere senvestigis lin. Li rifuĝis ĉe siajn samulojn kaj ili forpelis lin.

Estas sufiĉe da dupiedaj Garoloj kiel li, kiuj ofte ornamas sin per tio, kion ili ŝtelis al la aliaj: Oni nomas ilin "Verkoŝtelistoj."<sup>2</sup> Mi ne parolos pri ili; ili ne estas indaj je tio.

O.W. 7074 (FRANCUJO).

<sup>1</sup> Jay.

<sup>2</sup> Plagiary.

“La problemo estas solvita!”—diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj, kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. “patrino,” “mallarĝa,” “tranĉilo,” k.t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn *formitajn* kaj malaperi el la vortaro La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

(*Finigota en la proksima numero*).

“‘The problem is solved,’ I cried. I seized this idea of suffixes, and began to work hard upon it. I understood how important it was to make full use of this power—which, in natural languages, plays only a partial, blind, irregular and incomplete rôle—when consciously creating a new language. I began to compare words, to examine their constant and defined relationships, and every day I cast out from the dictionary a fresh vast series of words, substituting for this mass a single suffix, which signified a certain fixed relationship. I next remarked that a great number of words, hitherto regarded purely as ‘roots’ (such as ‘mother,’ ‘narrow,’ ‘knife’), might easily be treated as ‘formed words,’ and disappear from the dictionary. The mechanism of language stood before me as though it were upon the palm of my hand, and, inspired by love and hope, I began to work systematically. After that I soon had the entire grammar and a small dictionary in manuscript.”

<sup>1</sup> School preparatory for the University.

## NIAJ LIBERTEMPOJ.

Sinjoro H. Voituret (delegito de la Touring Club de France) skribis al mi “La tute admirinda lando, loĝita sur la limoj de Francujo kaj Svisujo, nomata Jura, estas ne sufiĉe konata de alilandaj turistoj.” Mi deziras danki lin pro lia sciigo ĉar ĝi memoras al mi unu el la plej grandaj plezuroj de la mondo, la turismon biciklete. Eble multe da miaj legantoj nun ekpensadas siajn libertempojn, kaj proponas iri en regionojn ĝis nun nekonatajn, kie ili povos renkonti diverslandajn gesamideanojn. Mi mem intencas tiun ĉi fari, kaj mi plezure donos sciigojn al ĉiuj, kiuj ilin petos, pri la alilanda bicikleta turismo. Mi ĝoje memoras la plezuregajn impresojn kiujn faris je mi la belaĵoj de tiu ĉi ĵusnomita Jura, kaj la apuda Departemento de l’Ain. Dum la pasinta Majo mi faris vojaĝon de dumil kilometroj, kun mia patro, kaj vidis multajn el la plej belaj regionoj en Francujo, Svisujo, Italujo, Germanujo kaj Belgujo per biciklo. La plezuro vere estis plezurego. Sed tiatempe mi ne konatiĝis kun Esperantistoj; kaj mi prezentas al mi ke la sama vojaĝo nun estus pli ol plezurplenega, ĉar mi konas la adresojn de multaj Esperantistoj, kiuj deziras paroladi Esperante kun ni, anoj de alia, sed tamen, tre proksima lando. Se iaj el vi, gelegantoj miaj, deziras ricevi kelkajn el tiuj ĉi adresoj, mi sendos ilin al vi; kaj mi estas certa ke vi neniam bedaŭros ke vi estas fidintaj je Esperanto por plezurpleni viajn libertempojn. Por turistoj, la granda helpo, kiun donas kono de la lingo internacia vere estas

neforgesinda. Per ĝi, vi povas lerni multe da interese-gaj aferoj, kiujn alie vie tute ne eltrovus. Mi skribas tiujn ĉi liniojn hodiaŭ ĉar la libertempoj jam alproksimiĝas. Mi ĉiam pliamas la longajn tagojn de la printempo al la varmegaj, kaj ofte pluplenaj, tagoj de la someraj monatoj. Tiel mi preskaŭ ĉiam elektis la Junian monaton por bicikleta vojaĝo inter la belaĵoj de mia propra lando, aŭ, pli bone, inter la montoj kaj lagoj de pli malproksimaj landoj, kie troviĝas bonegaj vojoj, kaj kie la ĉiutaga vivado estas tiel malsama je la nia. Sed sendube multaj el ni Esperantistoj deziras forvojaĝi eĉ pli frue. Eble kelkaj el ni jam estos foririntaj antaŭ la Pasko, kaj ĝia Aprila ESPERANTIST. Al ĉiuj, kiuj povas, mi kore konsilas vojaĝi alilande, kaj persone provi la helpon, kiun la lingvo internacia donos.

Tamen mi havas duan, kaj ne malindan celon. Multaj el vi sendube estas anoj de la fama *Cyclists’ Touring Club* Kaj vi jam scias ke la *Touring Club de France* estas la plej notinda helpanto de nia kara afero et Francujo. Nu, ĉu la C.T.C. ne devas ankaŭ klopodi pri Esperanto? Mi ĝin kredas, kaj mi fidus, ke antaŭ ne longe, ĝi furos ion por la afero. En la *C.T.C. Gazeto* de tiu ĉi Marta monato, troviĝas artikolo pri la lingvo, kaj mi fervore petegas, ke ĉiuj la Esperantistaj membroj de la C.T.C. skribu al la Redaktoro de ĝia Gazeto, kaj diru ke ili estas interesitaj, kaj ke ili esperas ke la C.T.C. klopodos pri Esperanto, same kiel la I.C.F. jam estas farinta. Tionfarante, ĉiuj multe helpos nin, kaj gajnos koregan dankesprimon de la tutmonda Esperantistaro.

LA REDAKTORO.

## LA LINGVO DE LA FLOROJ.

Originale verkita de Ben Elmy.

Mi ne intencas paroli pri la tiel nomata floringvo, per kies helpo timemaj amantoj iam kuragiĝis malkovri la flamon de kaŝita pasio. Tiu ĉi lingvo nur estis sistemo de silentaj signaloj; ekzemple, la sopiranta ĉielblua Ne-min-forgesu; la modesta Violo de espero; la delikatodora Resedo<sup>1</sup> anoncanta ke "Miaj ecoj superas miajn ĉarmojn"; la Rozo ruĝanta, oblembo de simpatio reciproka. Mi tute lasos tion ĉi al la junuloj de la brula Oriento, kie, oni diras, la fiktiva floringvo fariĝis sperta sciado, kvankam nur iom komisiita al la vulgara kaj malvarma nigro-kaj blanko de libroj presitaj.

Sed en tia lingvo, la floroj nur utiliĝas kvazaŭ senvolaj iloj por esprimi ian senton aŭ sciigon sole homan. Mi, do, plivolvas pensi kaj pensigi pri la lingvo kiun uzas la floroj mem, por sciigi siajn proprajn dezirojn kaj bezonojn al aliaj vivaj estaĵoj; ĉu insekto, ĉu birdo aŭ besto, ĉu eĉ la homo ankaŭ. Ĉe multe da belaj floroj sia rastaĵo mem dipendas de la apudesto de tiaj fremdaj kunhelpantoj.

Tamen la floroj—kun siaj postfruktoj ne posedas vortojn aŭ eĉ sonojn en sia lingvo; efektive, tio ĉi estas ankoraŭ nur "sistemo de silentaj signaloj"; koloro, formo, odoro, gusto—jen estas la solaj rimedoj de la floroj por altiri la insektojn kiuj interfruktigos la geflorojn, kaj la birdojn aŭ bestojn kiuj poste forportos kaj dissemos la semojn. Delogitaj de iom da mielo, la abeloj, papilioj, favoj, muŝoj, au skarabetoj, fariĝas ambasadoroj de amo inter la senmovaj gefloroj; kaj rekompencitaj de bongusta frukto, la birdoj aŭ bestoj fariĝas portantoj de semoj, nuksoj, kernoj,—kies sufiĉa proporcio enteriĝos fine en tero freŝa, malproksime de la parencaj floroj.

Sendube la diferenca konstruaĵo kaj ecoj de la

diversaspecaj floroj servas speciale por alvoki al tiuj ĉi la plej decajn kaj taŭgajn senditojn, ĉu de la amo, ĉu de la propagando. Ankaŭ estas fakto-alcertiga, ke tiaj floroj kiaj bezonas nur la venton por efektigi sian fruktigon, ĉiam estas floroj nerimarkindaj pro koloro, formo, aŭ odoro; kaj neniam kreas mielon.

Ĉu la floroj aŭ kreskaĵoj havas ian konsciencan aŭ propran volon, je siaj agoj aŭ funkciadoj? Ĉu vere "la kverko tremetas ĉe la unua bato de la hakilo" kiel kantas la poeto? Antaŭ nelonge la botanikistoj kutimis diri ke ĉiuj agoj de la floroj estas nur funkciadoj aŭtomataj, sen propra volo aŭ inteligento de la floro mem. La avo de la fama Charles Darwin estis, ŝajne, la unua observanto-kiu kuragiĝis pensi kaj diri ke la kreskaĵoj posedas ion analogian je la instinkto aŭ prudento de la vivuloj bestaj. Post nur iom da jaroj, Wordsworth ankaŭ diris:—

"Mi certe kredas—ĉiu kara flor'  
Ĝuadas la aeron kiun spiras."

Charles Darwin mem plibonigis kaj tre certigis la temon de sia avo; kaj, en nunaj tagoj, Dro. J. E. Taylor verkis plej interesan kaj mirandan libron pri la "Sagaceco kaj Moraleco de la Kreskaĵoj." Mi devus ankoraŭ citi multe da verkistoj, anglaj kaj alilandaj—Shelley, Tennyson, Lowell, Jefferies, Flammarion, Maeterlinck, Karr, k.t.p., sed mia spaco jam estas plenigita. Eble, ĉe estonta okazo, nia estimata Redaktoro permesos ke mi skribu iom plu pri tiuj observemaj verkistoj, kiuj havis kororelon por aŭskulti, kaj cerbon por kompreni, la silentan paroladon de niaj humilaj gefratoj, la floroj.

BEN ELMY.

<sup>1</sup> Mignonette.

## DU FABLOJ DE LAFONTAINE.

*La Korvo kaj la Vulpo.*—Belega korvo, sur arbo sidanta, tenis en sia beko fromaĝon. Vulpo altirita de la bonodoro, diris al li: "Nu! Bonan tagon, Via Korva Moŝto! Kiel bela vi estas! Kiom vi ŝajnas al mi belega! Mi ne volas mensogi; se via voĉo estas tiel bela, kiel estas via vestaĵo, vi estas la Fenikso el la logantoj en tiuj ĉi arbaroj."

Ĉe tiuj ĉi vortoj, pro ĝojego eksaltis la korvo, kaj, por aŭdigi sian belsonan voĉon, li large malfermis sian bekon, kaj preterlasis sian fromaĝon.

Tuj ekkaptis ĝin la vulpo kaj diris: "Mia bela sinjoro! Sciigu ke ĉiu flatulo vivas per la aferoj de tiuj, kiuj kredas je li. Tiu ĉi leciono sendube egalvaloras fromaĝon."

La korvo, hontanta kaj konfuza, ĵuris (sed iom tro mal'ruge) ke de nun, neniu trompos lin.

*La Garolo kaj la Plumoj de la Pavo.*—Pavo ŝanĝis plumojn: Garolo prenis ilin, kaj per ili sin vestis. Poste li aliris por promenadi, tre fiera, inter aliaj pavoj. Li kredis ke li estis eminentulo! Iur rekonis lin; ĉiuj lin mokis, kaj strangmaniere senvestigis lin. Li rifuĝis ĉe siajn samulojn kaj ili forpelis lin.

Estas sufiĉe da dupiedaj Garoloj kiel li, kiuj ofte ornamas sin per tio, kion ili ŝtelis al la aliaj: Oni nomas ilin "Verkoŝtelistoj."<sup>2</sup> Mi ne parolos pri ili; ili ne estas indaj je tio.

O.W. 7074 (FRANCUJO).

<sup>1</sup> Jay.

<sup>2</sup> Plagiary.

“La problemo estas solvita!”—diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj, kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstatatigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. “patrino,” “mallarĝa,” “tranĉilo,” k.t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn *formitajn* kaj malaperi el la vortaro La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

(*Finigota en la proksima numero*).

“‘The problem is solved,’ I cried. I seized this idea of suffixes, and began to work hard upon it. I understood how important it was to make full use of this power—which, in natural languages, plays only a partial, blind, irregular and incomplete rôle—when consciously creating a new language. I began to compare words, to examine their constant and defined relationships, and every day I cast out from the dictionary a fresh vast series of words, substituting for this mass a single suffix, which signified a certain fixed relationship. I next remarked that a great number of words, hitherto regarded purely as ‘roots’ (such as ‘mother,’ ‘narrow,’ ‘knife’), might easily be treated as ‘formed words,’ and disappear from the dictionary. The mechanism of language stood before me as though it were upon the palm of my hand, and, inspired by love and hope, I began to work systematically. After that I soon had the entire grammar and a small dictionary in manuscript.”

<sup>1</sup> School preparatory for the University.

## NIAJ LIBERTEMPOJ.

Sinjoro H. Voituret (delegito de la Touring Club de France) skribis al mi “La tute admirinda lando, loĝita sur la limoj de Francujo kaj Svisujo, nomata Jura, estas ne sufiĉe konata de alilandaj turistoj.” Mi deziras danki lin pro lia sciigo ĉar ĝi memoras al mi unu el la plej grandaj plezuroj de la mondo, la turismon biciklete. Eble multe da miaj legantoj nun ekpensadas siajn libertempojn, kaj proponas iri en regionojn ĝis nun nekonatajn, kie ili povos renkonti diverslandajn gesamideanojn. Mi mem intencas tiun ĉi fari, kaj mi plezure donos sciigojn al ĉiuj, kiuj ilin petos, pri la alilanda bicikleta turismo. Mi ĝoje memoras la plezuregajn impresojn kiujn faris je mi la belaĵoj de tiu ĉi ĵusnomita Jura, kaj la apuda Departemento de l’Ain. Dum la pasinta Majo mi faris vojaĝon de dumil kilometroj, kun mia patro, kaj vidis multajn el la plej belaj regionoj en Francujo, Svisujo, Italujo, Germanujo kaj Belgujo per biciklo. La plezuro vere estis plezurego. Sed tiatempem mi ne konatiĝis kun Esperantistoj; kaj mi prezentas al mi ke la sama vojaĝo nun estus pli ol plezurplenega, ĉar mi konas la adresojn de multaj Esperantistoj, kiuj deziras paroladi Esperante kun ni, anoj de alia, sed tamen, tre proksima lando. Se iaj el vi, gelegantoj miaj, deziras ricevi kelkajn el tiuj ĉi adresoj, mi sendos ilin al vi; kaj mi estas certa ke vi neniam bedaŭros ke vi estas fidintaj je Esperanto por plezurpleni viajn libertempojn. Por turistoj, la granda helpo, kiun donas kono de la lingo internacia vere estas

neforgesinda. Per ĝi, vi povas lerni multe da interese-gaj aferoj, kiujn alie vie tute ne eltrovus. Mi skribas tiujn ĉi liniojn hodiaŭ, ĉar la libertempoj jam alproksimiĝas. Mi ĉiam pliamas la longajn tagojn de la printempo al la varmegaj, kaj ofte polvplenaĵoj, tagoj de la someraj monatoj. Tiel mi preskaŭ ĉiam elektis la Junian monaton por bicikleta vojaĝo inter la belaĵoj de mia propra lando, aŭ, pli bone, inter la montoj kaj lagoj de pli malproksimaj landoj, kie troviĝas bonegaj vojoj, kaj kie la ĉiutaga vivado estas tiel malsama je la nia. Sed sendube multaj el ni Esperantistoj deziras forvojaĝi eĉ pli frue. Eble kelkaj el ni jam estos foririntaj antaŭ la Pasko, kaj ĝia Aprila ESPERANTIST. Al ĉiuj, kiuj povas, mi kore konsilas vojaĝi alilande, kaj persone provi la helpon, kiun la lingvo internacia donos.

Tamen mi havas duan, kaj ne malindan celon. Multaj el vi sendube estas anoj de la fama *Cyclists’ Touring Club*. Kaj vi jam scias ke la *Touring Club de France* estas la plej notinda helpanto de nia kara afero et Francujo. Nu, ĉu la C.T.C. ne devas ankaŭ klopodi pri Esperanto? Mi ĝin kredas, kaj mi fidlas, ke antaŭ ne longe, ĝi faros ion por la afero. En la *C.T.C. Gazeto* de tiu ĉi Marta monato, troviĝas artikolo pri la lingvo, kaj mi fervore petegas, ke ĉiuj la Esperantistaj membroj de la C.T.C. skribu al la Redaktoro de ĝia Gazeto, kaj diru ke ili estas interesitaj, kaj ke ili esperas ke la C.T.C. klopodos pri Esperanto, same kiel la I.C.F. jam estas farinta. Tionfarante, ĉiuj multe helpos nin, kaj gajnos koregan dankesprimon de la tutmonda Esperantistaro.

LA REDAKTORO.



## LA LINGVO DE LA FLOROJ.

Originale verkita de Ben Elmy.

Mi ne intencas paroli pri la tiel nomata floringvo, per kies helpo timemaj amantoj iam kuragiĝis malkovri la flamon de kaŝita pasio. Tiu ĉi lingvo nur estis sistemo de silentaj signaloj; ekzemple, la sopiranta ĉielblua Ne-min-forgesu; la modesta Violo de espero; la delikatodora Resedo<sup>1</sup> anoncanta ke "Miaj ecoj superas miajn ĉarmojn"; la Rozo ruĝanta, omblemo de simpatio reciproka. Mi tute lasos tion ĉi al la junuloj de la brula Oriento, kie, oni diras, la fiktiva floringvo fariĝis sperta sciado, kvankam nur iom komisiita al la vulgara kaj malvarma nigro-kaj blanko de libroj presitaj.

Sed en tia lingvo, la floroj nur utiliĝas kvazaŭ senvolaj iloj por esprimi ian senton aŭ sciigon sole homan. Mi, do, plivolvas pensi kaj pensigi pri la lingvo kiun uzas la floroj mem, por sciigi siajn proprajn dezirojn kaj bezonojn al aliaj vivaj estaĵoj; ĉu insekto, ĉu birdo aŭ besto, ĉu eĉ la homo ankaŭ. Ĉe multe da belaj floroj sia rasdaŭrigo mem dipendas de la apudesto de tiaj fremdaj kunhelpantoj.

Tamen la floroj—kun siaj postfruktoj ne posedas vortojn aŭ eĉ sonojn en sia lingvo; efektive, tio ĉi estas ankoraŭ nur "sistemo de silentaj signaloj"; koloro, formo, odoro, gusto—jen estas la solaj rimedoj de la floroj por altiri la insektojn kiuj interfruktigos la geflorojn, kaj la birdojn aŭ bestojn kiuj poste forportos kaj dissemos la semojn. Delogitaj de iom da mielo, la abeloj, papilioj, favoj, muŝoj, an skarabetoj, fariĝas ambasadoroj de amo inter la senmovaj gefloroj; kaj rekompencitaj de bongusta frukto, la birdoj aŭ bestoj fariĝas portantoj de semoj, nuksoj, kernoj,—kies sufiĉa proporcio enteriĝos fine en tero freŝa, malproksime de la parencaj floroj.

Sendube la diferenca konstruaĵo kaj ecoj de la

diversaspecaj floroj servas speciale por alvoki al tiuj ĉi la plej decajn kaj taŭgajn senditojn, ĉu de la amo, ĉu de la propagando. Ankaŭ estas fakto alcertiga, ke tiaj floroj kiaj bezonas nur la venton por efektigi sian fruktigon, ĉiam estas floroj nerimarkindaj pro koloro, formo, aŭ odoro; kaj neniam kreas mielon.

Ĉu la floroj aŭ kreskaĵoj havas ian konsciencan aŭ propran volon, je siaj agoj aŭ funkciadoj? Ĉu vere "la kverko tremetas ĉe la unua bato de la hakilo" kiel kantas la poeto? Antaŭ nelonge la botanikistoj kutimis diri ke ĉiuj agoj de la floroj estas nur funkciadoj aŭtomataj, sen propra volo aŭ inteligento de la floro mem. La avo de la fama Charles Darwin estis, ŝajne, la unua observanto kiu kuragiĝis pensi kaj diri ke la kreskaĵoj posedas ion analogian je la instinkto aŭ prudento de la vivuloj bestaj. Post nur iom da jaroj, Wordsworth ankaŭ diris:—

"Mi certe kredas—ĉiu kara flor'  
Ĝuadas la aeron kiun spiras."

Charles Darwin mem plibonigis kaj tre certigis la temon de sia avo; kaj, en nunaj tagoj, Dro. J. E. Taylor verkis plej interesan kaj mirandan libron pri la "Sagaceco kaj Moraleco de la Kreskaĵoj." Mi devus ankoraŭ citi multe da verkistoj, anglaj kaj alilandaj—Shelley, Tennyson, Lowell, Jefferies, Flammarion, Maeterlinck, Karr, k.t.p., sed mia spaco jam estas plenigita. Eble, ĉe estonta okazo, nia estimata Redaktoro permesos ke mi skribu iom plu pri tiuj observemaj verkistoj, kiuj havis kororelon por atŝskulti, kaj cerbon por kompreni, la silentan paroladon de niaj humilaj gefratoj, la floroj.

BEN ELMY.

<sup>1</sup> Mignonette.

## DU FABLOJ DE LAFONTAINE.

*La Korvo kaj la Vulpo.*—Belega korvo, sur arbo sidanta, tenis en sia beko fromaĝon. Vulpo altirita de la bonodoro, diris al li: "Nu! Bonan tagon, Via Korva Moŝto! Kiel bela vi estas! Kiom vi ŝajnas al mi belega! Mi ne volas mensogi; se via voĉo estas tiel bela, kiel estas via vestaĵo, vi estas la Fenikso el la loĝantoj en tiuj ĉi arbaroj."

Ĉe tiuj ĉi vortoj, pro ĝojego eksaltis la korvo, kaj, por atŝdigi sian belsonan voĉon, li larĝe malfermis sian bekon, kaj preterlasis sian fromaĝon.

Tuj ekkaptis ĝin la vulpo kaj diris: "Mia bela sinjoro! Sciigu ke ĉiu flatulo vivas per la aferoj de tiuj, kiuj kredas je li. Tiu ĉi leciono sendube egalvaloras fromaĝon."

La korvo, hontanta kaj konfuza, ĵuris (sed iom tro maltrue) ke de nun, neniu trompos lin.

*La Garolo kaj la Plumoj de la Pavo.*—Pavo ŝanĝis plumojn: Garolo pronis ilin, kaj per ili sin vestis. Poste li aliris por promenadi, tre fiera, inter aliaj pavoj. Li kredis ke li estis eminentulo! Iu rekonis lin; ĉiuj lin mokis, kaj strangmanieresenvestigis lin. Li rifuĝis ĉe siajn samulojn kaj ili forpelis lin.

Estas sufiĉe da dupiedaj Garoloj kiel li, kiuj ofte ornamas sin per tio, kion ili ŝtelis al la aliaj: Oni nomas ilin "Verkoŝtelistoj."<sup>2</sup> Mi ne parolos pri ili; ili ne estas indaj je tio.

O.W. 7074 (FRANCUJO).

<sup>1</sup> Jay.

<sup>2</sup> Plagiary.

“La problemo estas solvita!”—diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj, kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. “patriino,” “mallarĝa,” “tranĉilo,” k.t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn *formitajn* kaj malaperi el la vortaro La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

(*Finigota en la proksima numero*).

“‘The problem is solved,’ I cried. I seized this idea of suffixes, and began to work hard upon it. I understood how important it was to make full use of this power—which, in natural languages, plays only a partial, blind, irregular and incomplete *role*—when consciously creating a new language. I began to compare words, to examine their constant and defined relationships, and every day I cast out from the dictionary a fresh vast series of words, substituting for this mass a single suffix, which signified a certain fixed relationship. I next remarked that a great number of words, hitherto regarded purely as ‘roots’ (such as ‘mother,’ ‘narrow,’ ‘knife’), might easily be treated as ‘formed words,’ and disappear from the dictionary. The mechanism of language stood before me as though it were upon the palm of my hand, and, inspired by love and hope, I began to work systematically. After that I soon had the entire grammar and a small dictionary in manuscript.”

<sup>1</sup> School preparatory for the University.

## NIAJ LIBERTEMPOJ.

Sinjoro H. Voituret (delegito de la Touring Club de France) skribis al mi “La tute admirinda lando, loĝita sur la limoj de Francujo kaj Svisujo, nomata Jura, estas ne sufiĉe konata de alilandaj turistoj.” Mi deziras danki lin pro lia sciigo ĉar ĝi memoras al mi unu el la plej grandaj plezuroj de la mondo, la turismon biciklete. Eble multe da miaj legantoj nun ekpensadas siajn libertempojn, kaj proponas iri en regionojn ĝis nun nekonatajn, kie ili povos renkonti diverslandajn gesamideanojn. Mi mem intencas tiun ĉi fari, kaj mi plezure donos sciigojn al ĉiuj, kiuj ilin petos, pri la alilanda bicikleta turismo. Mi ĝoje memoras la plezuregajn impresojn kiujn faris je mi la belaĵoj de tiu ĉi ĵusnomita Jura, kaj la apuda Departemento de l’Ain. Dum la pasinta Majo mi faris vojaĝon de dumil kilometroj, kun mia patro, kaj vidis multajn el la plej belaj regionoj en Francujo, Svisujo, Italujo, Germanujo kaj Belgujo per biciklo. La plezuro vere estis plezurego. Sed tiatempe mi ne konatiĝis kun Esperantistoj; kaj mi prezentas al mi ke la sama vojaĝo nun estus pli ol plezurplenega, ĉar mi konas la adresojn de multaj Esperantistoj, kiuj deziras paroladi Esperante kun ni, anoj de alia, sed tamen, tre proksima lando. Se iaj el vi, gelegantoj miaj, deziras ricevi kelkajn el tiuj ĉi adresoj, mi sendos ilin al vi; kaj mi estas certa ke vi neniam bedaŭros ke vi estas fidintaj je Esperanto por plezurpleni viajn libertempojn. Por turistoj, la granda helpo, kiun donas kono de la lingo internacia vere estas

neforgesinda. Per ĝi, vi povas lerni multe da intereseĝaj aferoj, kiujn alie vie tute ne eltrovus. Mi skribas tiujn ĉi liniojn hodiaŭ ĉar la libertempoj jam alproksimiĝas. Mi ĉiam pliamas la longajn tagojn de la printempo al la varmegaj, kaj ofte polvplenaĵoj, tagoj de la someraj monatoj. Tiel mi preskaŭ ĉiam elektis la Junian monaton por bicikleta vojaĝo inter la belaĵoj de mia propra lando, aŭ, pli bone, inter la montoj kaj lagoj de pli malproksimaj landoj, kie troviĝas bonegaj vojoj, kaj kie la ĉiutaga vivado estas tiel malsama je la nia. Sed sendube multaj el ni Esperantistoj deziras forvojaĝi eĉ pli frue. Eble kelkaj el ni jam estos foririntaj antaŭ la Pasko, kaj ĝia Aprila ESPERANTIST. Al ĉiuj, kiuj povas, mi kore konsilas vojaĝi alilande, kaj persone provi la helpon, kiun la lingvo internacia donos.

Tamen mi havas duan, kaj ne malindan celon. Multaj el vi sendube estas anoj de la fama *Cyclists’ Touring Club*. Kaj vi jam scias ke la *Touring Club de France* estas la plej notinda helpanto de nia kara afero et Francujo. Nu, ĉu la C.T.C. ne devas ankaŭ klopodi pri Esperanto? Mi ĝin kredas, kaj mi fidas, ke antaŭ ne longe, ĝi faros ion por la afero. En la *C.T.C. Gazeto* de tiu ĉi Marta monato, troviĝas artikolo pri la lingvo, kaj mi fervore petegas, ke ĉiuj la Esperantistaj membroj de la C.T.C. skribu al la Redaktoro de ĝia Gazeto, kaj diru ke ili estas interesitaj, kaj ke ili esperas ke la C.T.C. klopodos pri Esperanto, same kiel la I.C.F. jam estas farinta. Tionfarante, ĉiuj multe helpos nin, kaj gajnos koregan dankesprimon de la tutmonda Esperantistaro.

LA REDAKTORO.

## LA LINGVO DE LA FLOROJ.

Originale verkita de Ben Elmy.

Mi ne intencas paroli pri la tiel nomata floringvo, per kies helpo timemaj amantoj iam kuraĝis malkovri la flamon de kaŝita pasio. Tiu ĉi lingvo nur estis sistemo de silentaj signaloj; ekzemple, la sopiranta ĉielblua Ne-min-forgesu; la modesta Violo de espero; la delikatodora Resedo<sup>1</sup> anoncanta ke "Miaj ecoj superas miajn ĉarmojn"; la Rozo ruĝanta, emblemo de simpatio reciproka. Mi tute lasos tion ĉi al la junuloj de la brula Oriento, kie, oni diras, la fiktiva floringvo fariĝis sperta sciado, kvankam nur iom komisiita al la vulgara kaj malvarma nigro-kaj blanko de libroj presitaj.

Sed en tia lingvo, la floroj nur utiligas kvazaŭ senvolaĵoj iloj por esprimi ian senton aŭ sciigon sole homan. Mi, do, plivolvas pensi kaj pensigi pri la lingvo kiun uzas la floroj mem, por sciigi siajn proprajn dezirojn kaj bezonojn al aliaj vivaj estaĵoj; ĉu insekto, ĉu birdo aŭ besto, ĉu eĉ la homo ankaŭ. Ĉe multe da belaj floroj sia rasdaŭrigo mem dipendas de la apudesto de tiaj farindaj kunhelpantoj.

Tamen la floroj—kun siaj postfruktoj ne posedas vortojn aŭ eĉ sonojn en sia lingvo; efektive, tio ĉi estas ankoraŭ nur "sistemo de silentaj signaloj"; koloro, formo, odoro, gusto—jen estas la solaj rimedoj de la floroj por altiri la insektojn kiuj interfruktigas la geflorojn, kaj la birdojn aŭ bestojn kiuj poste forportos kaj dissemos la semojn. Delogitaj de iom da mielo, la abeloj, papilioj, favoj, muŝoj, au skarabetoj, fariĝas ambasadoroj de amo inter la senmovaj gefloroj; kaj rekompencitaj de bongusta frukto, la birdoj aŭ bestoj fariĝas portantoj de semoj, nuksoj, kernoj,—kies sufiĉa proporcio enteriĝos fine en tero freŝa, malproksime de la parencaj floroj.

Sendube la diferenca konstruaĵo kaj ecoj de la

diversaspecaj floroj servas speciale por alvoki al tiuj ĉi la plej decajn kaj taŭgajn senditojn, ĉu de la amo, ĉu de la propagando. Ankaŭ estas fakto alcertiga, ke tiaj floroj kiaj bezonas nur la venton por efektigi sian fruktigon, ĉiam estas floroj nerimarkindaj pro koloro, formo, aŭ odoro; kaj neniam kreas mielon.

Ĉu la floroj aŭ kreskaĵoj havas ian konsciencan aŭ propran volon, je siaj agoj aŭ funkciadoj? Ĉu vere "la kverko tremetas ĉe la unua bato de la hakilo" kiel kantas la poeto? Antaŭ nelonge la botanikistoj kutimis diri ke ĉiuj agoj de la floroj estas nur funkciadoj aŭtomataj, sen propra volo aŭ inteligento de la floro mem. La avo de la fama Charles Darwin estis, ŝajne, la unua observanto kiu kuraĝis pensi kaj diri ke la kreskaĵoj posedas ion analogian je la instinkto aŭ prudento de la vivuloj bestaj. Post nur iom da jaroj, Wordsworth ankaŭ diris:—

"Mi certe kredas—ĉiu kara flor'  
Ĝuadas la aeron kiun spiras."

Charles Darwin mem plibonigis kaj tre certigis la temon de sia avo; kaj, en nunaj tagoj, Dro. J. E. Taylor verkis plej interesan kaj mirandan libron pri la "Sagaceco kaj Moraleco de la Kreskaĵoj." Mi devus ankoraŭ citi multe da verkistoj, anglaj kaj alilandaj—Shelley, Tennyson, Lowell, Jefferies, Flammarion, Maeterlinck, Karr, k.t.p., sed mia spaco jam estas plenigita. Eble, ĉe estonta okazo, nia estimata Redaktoro permesos ke mi skribu iom plu pri tiuj observemaj verkistoj, kiuj havis korelon por atskulti, kaj cerbon por kompreni, la silentan paroladon de niaj humilaj gefratoj, la floroj.

BEN ELMY.

<sup>1</sup> Mignonette.

## DU FABLOJ DE LAFONTAINE.

*La Korvo kaj la Vulpo.*—Belega korvo, sur arbo sidanta, tenis en sia beko fromaĝon. Vulpo altirita de la bonodoro, diris al li: "Nu! Bonan tagon, Via Korva Moŝto! Kiel bela vi estas! Kiom vi ŝajnas al mi belega! Mi ne volas mensogi; se via voĉo estas tiel bela, kiel estas via vestaĵo, vi estas la Fenikso el la loĝantoj en tiuj ĉi arbaroj."

Ĉe tiuj ĉi vortoj, pro ĝojego eksaltis la korvo, kaj, por aŭdigi sian belsonan voĉon, li larĝe malfermis sian bekon, kaj preterlasis sian fromaĝon.

Tuj ekkaptis ĝin la vulpo kaj diris: "Mia bela sinjoro! Sciigu ke ĉiu flatulo vivas per la aferoj de tiuj, kiuj kredas je li. Tiu ĉi leciono sendube egalvaloras fromaĝon."

La korvo, hontanta kaj konfuza, ĵuris (sed iom tro maltrue) ke de nun, neniu trompos lin.

*La Garolo kaj la Plumoj de la Pavo.*—Pavo ŝanĝis plumojn: Garolo prenis ilin, kaj per ili sin vestis. Poste li aliris por promenadi, tre fiera, inter aliaj pavoj. Li kredis ke li estis eminentulo! Iur rekonis lin; ĉiuj lin mokis, kaj strangmaniere senvestigis lin. Li rifuĝis ĉe siajn samulojn kaj ili forpelis lin.

Estas sufiĉe da dupiedaj Garoloj kiel li, kiuj ofte ornamas sin per tio, kion ili ŝtelis al la aliaj: Oni nomas ilin "Verkoŝtelistoj." Mi ne parolos pri ili; ili ne estas indaj je tio.

O.W. 7074 (FRANCUJO).

<sup>1</sup> Jay.

<sup>2</sup> Plagiary.

## LA ĈIELAJ PORDOJ.

Originale Verkita de J. H. Meyrick.

Riĉegulo kuŝis suferanta lite. Parencoj, amikoj, kaj konatuloj ĉirkaŭstaris, sed li ne aŭdis plu. Ombroj de la morto ekmallumigis liajn okulojn: la voĉoj de la ĉeestantoj ŝajnis al li forigi: fine, eĉ la ĉambro malproksimiĝis.

Li estis vivinta multe da jaroj. Ĉio, kio povis goĝigi la homan koron, estis por li atingebla. Tiel estas la mona povo.

Li ne estis malbonulo, laŭ la ordinara signifo de tiu ĉi vorto; oni eĉ povus diri, ke li estis bonulo; sed lia boneco estis de speco negativa. Li ne faris multe da malbonaĵoj, sed certe li preskaŭ neniam faris bonaĵon.

Nun ĉio estis finita. Teraj aferoj velkis el lia rigardo. Mirinda malpezeco, al li nekomprenebla, lin posedis. Li kvazaŭ rapide flugis tra la aero. Fine li sin sentis devigita halti en regiono lumigita per miloj da gloraj radioj, elirantaj el nevidebla centro.

Ekgajante, li volis autaŭneniri. Subite estaĵo je dia beleco, aperis el la lumo, kaj diris—

“Kion vi deziras tie ĉi, ĉe la ĉielaj pordoj?”

“Mi deziras eniri” respondis la riĉegulo.

“Amiko, ne estas eble, ĉar vi ne taŭgas. Dum via tuta vivo vi ĉiam estis sinrigardema; vi neniam vin ĝenis pri la ĉagrenoj kaj malfeliĉecoj de viaj similuloj. Tiu ĉi loko ne estas por tieloj. Sed bone aŭskultu, amiko, via tera vivo ne ankoraŭ estas finita. Zorgu, do, ke vi ne denove maluzu vian okazon.”

Tion dirinte, la bela anĝelo malaperis.

La riĉegulo revenis teren kaj lia animo reeniris sian korpon.

Eĉ dum tiu ĉi mallonga tempo kiam lia korpo ne montris plu signojn de vivo, kaj oni pensis ke li estis mortinta, lia riĉeco kreskigis malamon je la koroj de la ĉeestantoj Avaraj pensoj malamikigis ilin, unu kontraŭ la alia. La riĉegulo vekigis. Oni lin gratulis per simulitaj bondeziroj, kaj la ĉagrenitaj ĉeestantoj foriris.

La riĉegulo baldaŭ resaniĝis, sed la memoron de sia ĉiela veturo li forgesis neniam. Lia nuna vivo estis tute malsimila al la antaŭa. Li renoncis je ĉiuj luksaĵoj, kaj simple vivadis, kaj libere donacis multe da mono por la plibonigo de la homaro.

En tago li denove malsaniĝis kaj ŝajne mortis. Alveninte ĉe la ĉielaj pordoj, la glora anĝelo renkontis lin, kaj denove malpermesis ke li eniru, dirante ke li ne taŭgas: “Mi scias ke vi intencas diri al mi, ke vi libere donacis el via riĉeco. Mi jam scias tion. Sed nur el via pleneco vi estas doninta. La tuto de tiuj ĉi donacoj neniam kostis al vi eĉ senigeton. Foriru, amiko, restas ankoraŭ

por vi iom da tervivo. Sed memoru ke tiu ĉi estas la lasta.”

La anĝelo tiam malaperis kaj, sopirante, la riĉegulo sin trovis tere.

Li profunde konservis en la memoro tiun ĉi ĉielan songon kaj fine decidis disvastigi sian tutan bienon per bonagoj. Baldaŭ li fariĝis malriĉegulo kaj sperte eltrovis le signifon de malriĉeco. Tiel, li vere mortis, kaj alvenis al la pordoj gloraj. La bela anĝelo tiun ĉi fojon parolis kun li pli ĝentile, kaj pli dolĉe ol antaŭe: “Kara mia amiko! Ĉu vi pensas ke mi nun povas vin enirigi tra la ĉielaj pordoj?”

“Ho! Sinjoro, mi pensis ke certe mi povus eniri. Vi bone scias ke mi faris ĉion, kion mi povis por ĝin meriti.”

“Mi scias ĉion, tamen pro tio mi ne prave agas, se mi vin enlasus.”

Je tiuj ĉi paroloj, fortunis la kompatinda malriĉegulo. Li ŝajnis tiel malfeliĉa ke eĉ la anĝelo sopiris, kaj diris: “Ne, restu do. Mi ne estas dirinta ke mi ne vin enlasos. Mi nur diris ke la plimulto da viaj agoj ne taŭgas por ke vi tien ĉi eniru. Tamen, el viaj tutaj agadoj, estas almenaŭ unu, kiu gajnos por vi eniron tra tiuj ĉi pordoj. Eble vi forgesis ĝin: Jen—” kaj tuj la malriĉulo vidis antaŭ li, kiel en spegulo, preskaŭ forgesitan epizodon en sia vivado. Ĝi okazis ne longe antaŭ lia morto, kiam li estis tre, tre malriĉa. En tago, lacigite per longa piedveturo, li vojoŝtanke ripozis. Li estis tre malsata kaj treege soifis. En saketo li posedis malmulte da vinberoj, kaj peceton da pano: En botelo li ankaŭ havis kelkajn gutojn da akvo, kiujn li trezore estis gardinta ĉar la regiono estis dezerta, kaj estis sekega sezono. Mangonte, li vidis knabeton laŭtege plorantan. Videble la malgrandulo vojperdis kaj sencele vagis. Tuj lia koro pleniĝis je kompatato. Preninte la knabeton en siajn brakojn, li trankviligis lin. Baldaŭ li eltrovis ke la junulo estis per malsato kaj soifo svenonta. Li tuj donis la tuton da sia pano, vinberoj kaj akvo, kaj plezure rigardis la knabeton ĉion mangi. Poste li portis la infanon kelke da mejloj ĝis la proksima vilaĝo, kie li eltrovis la gepatran domon. Sen atendante ian dankesprimon, li rapide forkuris, lacega, malsata kaj soifanta, nesciante kie li trovus akveron aŭ panan peceton.

Tio ĉi pasis antaŭ li kiel songa pentraĵo, kaj dum li miradis, la anĝela voĉo diris “Ĉu vi nun komprenas, amiko mia! Ĉu vi ne nun ekvidas ke antaŭe, kiam vi estis riĉegulo, vi ĉiam pagis, kaj aliaj klopodis por vi. Sed je tiu ĉi okazo vi mem agis, vi mem suferis. Eniru do la pordojn ĉielajn!”

# ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the spreading  
of the International Language.

Edited by H. BOLINGBROKE MUDIE.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents.)

Published by THE LONDON ESPERANTO CLUB, 11, Outer Temple, London, W.C.

## CONTENTS.

|   | Page  |
|---|-------|
| EDITOR'S NOTE   | 41-42 |
| EDITORIAL NOTES   | 43    |
| MALDEN MEMORIAL   | 44    |
| TWO PARISH  | 44    |
| ITALIAN CONVENTION (by Clarence<br>Bicknell)                                      | 45    |
| THE GREEN MAN (by Edward Malville,<br>Esq., M.A., Oxon)                           | 46-47 |
| THE HISTORY OF REPUBLICS, continued from<br>page 76-77 (translated by John Ellis) | 47-49 |
| THE TOWER, continued (translated by<br>A. Malville)                               | 49    |
| COMMUNISTICAL NOTES   | 49    |
| A VISIT TO THE HOUSE OF COMMONS<br>(by Miss Lawrence)                             | 53    |
| VARIOUS ITEMS OF INTEREST   | 54    |
| HEALTHFUL REMINDERS   | 55-56 |

FOR FREE PARTICULARS write to  
the HON. SECRETARIES of  
ESPERANTO SOCIETIES at

BOURNEMOUTH, I. F. H. Woodward, Esq.,  
Newwood, St. Swithin's Road.

DUBLIN, C. Fournier, Esq.,  
Esperanto Association, 28, Kesh's Green.

EDINBURGH, Miss Tweedie, M.A.,  
2, Spence's Corner.

GLASGOW, J. Hunter, Esq.,  
128, Darnley Street, Falkirk Road.

GUDDERSFIELD, C. H. Taylor, Esq.,  
15, Ribley Hall Road.

KINGSLY, J. Ellis, Esq.,  
Compton Buildings, West Street.

LEEDS, J. E. Wyrms, Esq.,  
2, Marlborough Street.

LONDON, H. Bolingbroke Mudie,  
11, Outer Temple, W.C.

NEWCASTLE, H. W. Clephane, Esq.,  
3, Colville Terrace, Gateshead.

PLYMOUTH, J. A. Tait, Esq.,  
6, Bicker's Terrace, Marnham.

PORTSMOUTH, Dr. Greenwood,  
21, St. George's Square.

TYNEMOUTH, Alan F. Derryham, Esq.,  
26, Park Crescent, N. Shields.

WIMBLEDON, W. Inge, Esq.,  
Spencer Gardens, Wimbeldon.

P.S.—It is earnestly hoped that contributors who are sending  
in terms that cannot well be reconciled with the aims of the  
Esperanto Club, will send the editor some notice of their views.

*The Remington*  
**THE UNIVERSAL TYPEWRITER.**

*Just think of it!*

**THE INTERNATIONAL MACHINE.**

*Endorsed by men of authority:  
 "The common sense of business men all over the world."*

The Remington type is manufactured by the  
 Remington Co.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
 100, Broadway St., London, E.C.

*La Remington*  
**LA UNIVERSALA SKRIBMAŜINO.**

*Spreneau je tio!*

**LA INTERNACIA MASINO.**

*Pola libereco de partoj havigi  
 La Komuna masino por ĉiuj civiligitaj landoj.*

La Remington masino (prezenta laŭ Remington)  
 estas la plej bona.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
 100, Broadway St., London, E.C.

**To Interest Your Friends,**

Send 2/6 to the Librarian, Dr. HOWARD, Dept. 4  
 The Bodleian, Weston Park, Oxon., for 4  
 copies of No. 22. These can subsequently be  
 returned with 1/3 extra, and arranged for The  
 Complete Text Book if desired.

**THE NEWEST PERFUME.**

**ESPERO.** *It gives and lasts longer than  
 any other perfume.*

Price 2/6. Post Free 3/0.

GEO. G. LAW, 298, King's Road, Chelsea,  
 London, S.W.

**Esperanto**



**WHAT IS ESPERANTO?**

It is a new language for all nations. Always  
 ready for use, it is simple and easy to learn. All  
 people can learn it in a few weeks. It is a  
 language of peace and friendship. It is a  
 language of the future. It is a language of  
 the world. It is a language of the people.  
 It is a language of the future. It is a language  
 of the world. It is a language of the people.

The Complete Text Book, and 16 Bk. for  
 Text, Acc., Esperanto Club,  
 45, Whitechapel, London, E.C.

It is a language of the future, and every nation  
 is ready to learn it.

**Facsimile of the Esperanto Postcard.**

On each side, 2/6 for 10.  
 Please state whether inland or foreign.

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Cnurtral.  
CANADA.—A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal.  
FRANCE.—M. Paul Fruictier, Boulevard Arago 27, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—G. B. Smith, Esq., 19, Wiborg Quay, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.  
TRINIDAD.—Geo. O. Messerly, Esq., Port of Spain.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtsignon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.  
Oni povas sendi la abonpaĝon per poŝtsignoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

No. 6.

APRILIO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net.]

## IO NOVA SUB LA SUNO.

Antaŭ ne longe mi ricevis bone presitan sed misteran libreton, nome: *Tri L. Zamenhofin kansainvalinen apukieli Esperanto. Kielioppi sekä Esimerkki ja Harjoitussarja. Suomenkielelle Muodostaneet.*

Mi unue pensis ke ĝi estis nova mistera Volapük, sed baldaŭ eltrovis ke la kunfratoj en la *Lando de Lagoj kaj Marĉoj* nun havas sian propran Esperantan Lernolibron (72 paĝoj, 1s.).

Ĝis nun ne estas multe da Esperantistoj en Finnlando, kaj la ekzistantoj devis sendube lerni per la Sveda Lernolibro de Dro. Henriclundquest.

Nun, espereble, nia Esperantistaro gajnos multajn rekrutojn inter la anoj de tiu ĉi malmulte konata lando.

Elbe la legantoj estos interesitaj je kelkaj vortoj pri tiu ĉi lingvo, kiu tute ne similas al la plimulto da Eŭropaj lingvoj. Nek Romanika, nek Germanika, la Finlandlingvo estas iom simila al la Turka, Tartara, Lapa, kaj Magjara. Estas membro de la Turania lingvofamilio.

La Substantivoj neniam ŝanĝiĝas, sed, por montri nombron, kaj sekson, aliaj vortoj aldoniĝas. Prepozicioj kaj Pronomoj estas aldonitaj al la vortoj kiujn ili rilatas. La verbo havas nur tempojn estantan kaj estintan. Kiam oni deziras uzi la estontan, oni aldonas vorton al la estanta.

Vere, je la unua impresio, tiu ĉi lingvo ne ŝajnas esti belsona, sed la kritikisto Rask opiniis, ke ĝi estas la plej belsona el ĉiuj naciaj lingvoj.

Por atesti je la rapida progreso farita de

## SOMETHING NEW UNDER THE SUN.

A short time since I received a well-printed but mysterious booklet, entitled: *Tri L. Zamenhofin kansainvalinen apukieli Esperanto. Kielioppi sekä Esimerkki ja Harjoitussarja. Suomenkielelle Muodostaneet.*

At first I thought it was some new mysterious Volapük, but soon discovered that brethren in the *Land of Lakes and Marshes* now have their own Esperanto textbook (72 pages, 1s.).

Up to the present there are not many Esperantists in Finland, and those who already exist must, doubtless, have learned from the Swedish Textbook of Dr. Henriclundquest.

It is now to be hoped that our Army will gain many recruits among the dwellers in this little-known land.

Possibly readers will be interested by a few words on this language, which is quite different from most European tongues. Neither Romance nor Teutonic, Finnish somewhat resembles Turkish, Tartar, Lapp, and Magyar. It is a member of the Turanian family.

The Substantives never vary; but, in order to indicate number, sex, etc., other words are added. Prepositions and Pronouns are added to the words to which they refer. The verb has only Present and Past tenses. When desirous of using the Future, one has to add another word to the Present.

Truly, at first sight, this tongue does not seem to sound well, but the critic Rask considered it to be the most euphonious of all national languages.

In testifying to the rapid progress made by

Esperanto en la civilizita mondo estas ja grava afero, ke oni povas citi lernolibrojn en tiaj malmulte konataj lingvoj, sed alia fakto nun sin prezentas por montri tiun ĉi progresadon.

La longe atendita *Internacia Scienca Revuo* nun eliris, kaj kredeble plaĉos al tiuj, kiuj ĝin senpacience atendis. Kvankam ĝi aperis nur je la fino de la Februara monato, oni ĝin nomas Januara numero. Oni do petas ke la abonantoj memoru ke ĝi enhavas revuon de la sciencaj agadoj de la antaŭa monato.

La ekstarajo kaj enhavo estas tre bonaj, kaj mi esperas ke la sindonema Sro. Fruictier trovos multe da Kunlaborantoj kaj Abonantoj, por ke la Revuo estu tute sukcesplena. Jen malmultaj eliraĵoj el la antaŭparolo.

"Antikve oni diris: *Nil novi sub sole*; ni povas nun proklami: *Io nova sub la suno*. Jen aperas pruvo, palpebla pruvo, ke Esperanto kreskas, progresas, vivas. Fondo de Internacia scienca Revuo, redaktata nur en lingvo artefarita, estas ja fakto novega signifega, promesplena. Forpasis periodo de pura filantropio; alvenas rapide tempo de praktika, de vere utila uzado de Esperanto. . . . Ni klopodos ja doni tradukojn de verkoj plej gravaj; ni analizos tiujn, kiujn ni ne povos traduki pro manko da spaco; fine ni raportos mallonge pri enhavo de diverslandaj sciencaj organoj. . . . La mondo, kiu mokis, kiu nin nomis utopiistoj, la mondo devos tiam penti sian propran frenezecon. Al vanaj kontraŭdiroj ni povos nun kontraŭmeti faktojn; al avidemo proponi laŭvole riceveblan profiton; al malfamaj malamikoj ni povos rebati per gloraĵoj nomoj de nia patronaro kaj kunlaborantaro. Tia estas nia celo. Niaj amikoj ne lasu pereji senfrukte nian entreprenon. Ni faris levilon potencegan; kiel Arkimedo, mankas al ni nur apogloko. Apogon ili donu al ni: ni kune levos la mondon."

Kiam oni konsideras pri tio, ke ĝis nun scienculoj ne povas eksciigi pri ĉiuj novaj sciencaj esploraĵoj, se ili ne komprenas almenaŭ la Anglan, Francan, kaj Germanan lingvojn, oni klare vidas ke tiu ĉi scienca organo povos esti tre utila al ili.

La Revuo eliradas ĉiumonate, enhavas tridek du paĝojn, kaj la abonpago (7 frankoj) estas akceptata ĉe 41, Outer Temple, W.C.

Tiu ĉi estas la sesa numero de THE ESPERANTIST, kaj, dum la duonjaro de sia vivado, ĝi gajnis tutmondan legantaron. Nunatempe pli ol tridek procent da la abonintoj loĝas alilande. La Redaktoro opinias ke estos tre interese se la amikoj afable sendadus artikoletojn kaj leterojn pri la

Esperanto in the civilised world, it is assuredly important to be able to cite grammars in such little-known idioms, but another circumstance now presents itself to indicate this continued progress.

The long-expected *International Scientific Review* is now published, and should please all who have impatiently awaited it. Although appearing only at the end of February, it is styled the January number. Subscribers are requested to bear in mind that it contains a review of the scientific events of the preceding month.

Both exterior and contents are very good, and I hope that the devoted M. Fruictier will find many Collaborators and Subscribers, so that the Review may be thoroughly successful. Here are a few excerpts from the foreword.

"Of old it hath been said: Nothing new under the sun; we can now proclaim: Something new under the sun. Here is a proof, a palpable proof, that Esperanto grows, progresses, lives. The foundation of a scientific Review edited wholly in the international language is assuredly a most novel, significant event, full of promise. Past is the period of pure philanthropy; speedily comes the time of a practical, of a really useful employment of Esperanto. . . . We shall take steps to give translations of highly important works; we shall analyse those which, for lack of space, we cannot translate; finally, we shall report in brief the contents of the scientific organs of divers lands. . . . The world, which has mocked, which has called us Utopians, the world will then have to repent its folly. To worthless objections we can now submit facts; to the self-seeking offer immediate benefit at will; insignificant opponents we can refute by the celebrated names of our renowned Patrons and Collaborators. Such is our purpose. May our friends not permit our enterprise fruitlessly to perish. We have created a most powerful lever; like Archimedes, we now need but a fulcrum. Give us that fulcrum, and, together, we will raise the world."

Considering that, up to the present, scientific men cannot become informed of the new results of scientific research unless they know at least English, French, and German, it is quite obvious that this scientific organ can be very useful to them.

The Review is published monthly, contains 32 pages, and the subscription (6s.) can be sent to 41, Outer Temple, W.C.

This is the sixth number of THE ESPERANTIST, and, during the half-year of its existence, it has gained a world-wide circulation. At present more than thirty per cent. of the Subscribers dwell abroad. The Editor believes it would be most interesting if friends would kindly send *short*



*ĉiutaga vivo, notindaj kutimoj, k.t.p., de siaj propraj landoj.* En Esperanta Gazeto pli ol en alia, oni devus atendi tiajn interesajn sciigojn; kaj, se niaj amikoj tiel faros, la diverslandanoj multe lernos pri siaj najbaroj, ĝis nun preskaŭ nekonataj. Por komenci, en tiu ĉi kajero estas la artikoloj pri la *Militaj Rekrutoj en Italujo*, kaj la *Unuaj Impresoj pri la Angla Parlamentejo*. So tiuj ĉi interesas, ni esperu ke multe da similaĵoj poste aperos. Nuntempe oni ofte forgesas ke la legado povas tiel instrui, kiel amuzi. Rigardu la reklamon de unu el niaj samtempaj Gazetoj: "Tiu ĉi Gazeto nur ekzistas por amuzi, ne por instrui!" Se amikoj kunhelpos, THE ESPERANTIST celos je instruado kaj amuzado

LA REDAKTORO.

*articles and letters about the daily life, memorable customs, etc., of their own lands.* In an Esperanto Gazette, more than elsewhere, such interesting information should be expected; and, if our friends will do this, the inhabitants of divers lands will naturally learn much about their hitherto almost unknown neighbours. As a beginning, in this issue are the articles on *Italian Conscription* and *First Impressions of the Houses of Parliament*. If these prove interesting, let us hope that many similar items will be forthcoming. At present one often forgets that reading can instruct, as well as amuse. See the advertisement of one of our contemporaries: "This Gazette is only to amuse, not to instruct!" If friends will cooperate, THE ESPERANTIST purposes to instruct and amuse.

### SCIENCAJ AFEROJ.

Oni nun ekkredas ke la Aŭroro, tiu sorĉanta lumo de la polusaj regionoj, estas produktata per la ago de elektronoj, elsenditaj el la suno, je *Kruptono*, la nove eltrovita elemento en nia aero.

\* \* \*

Doktoro Searle, Urbestro de Dartmouth, antaŭmetas la teorion ke ftizo kuraciĝas per inokulado de baciloj pli fortaj ol tiuj de la ftizo. La rezultato estas ke ili mortigas la ftizajn bacilojn, kaj ili mem mortigas. Tiu ĉi rimedo malsimilas tiun de Dro. Koch, kiu inokulis per *tuberklin'o* kiu formiĝas per la ftizaj baciloj. Dro. Searle petas ke oni sendu al li tiujn, kiuj preskaŭ certe mortigos antaŭ ses aŭ dek monatoj, kaj li diras ke li kuracos ilin.

\* \* \*

Eksperimentoj faritaj de Doktoro W. Johansen ĉe Copenhagen, montras ke la neaktiveco de kreskaj vivo, simila al tiu, kiu okazas dum la vintro, povas per kloroformo kaŭziĝi. Poste la kreskado plirapidiĝas, kaj la kreskaĵo floras pli baldaŭ ol nature. Tiuj ĉi eksperimentoj ne estas sendanĝeraj, ĉar, se la aero eniros en ĉambron per kloroformo plenigita, kaj alumeto apudiĝos, grandega eksplodo okazos.

\* \* \*

Ĉiuj estas aŭdintaj pri la "X Radioj"; iuj pri la  $\alpha$   $\beta$  and  $\gamma$  radioj de radiumo; sed nur malmultaj

pri la "N Radioj," kiujn Sinjoro Blondlot eltrovis. Li rimarkis ke, rigardante la ciferplaton de horloĝo en malbone lumigita ĉambro, ĝi ŝajne pliklariĝas kiam oni fleksis pecon da ligno apud la okulo de la rigardanto. Li kredas ke la fleksita ligno elsendas radiojn, kiuj farigas la okulon pli senteman. Oni trovas ke briko submetiĝita je la suna lumo ankaŭ elsendas similaĵojn.

\* \* \*

Propono antaŭmetiĝis ke la radio-aktiveco de radiumo eble povus esti helpata per la bombardado de siaj propraj radiecoj. Se tiu ĉi estu korekta, iom da radiumo, kiam disigita inter amaso de peblendo, estus malpli aktiva ol kiam centriĝita en malgranda spaco. Por pravi tion, Profesoro Rutherford mezuris la radio-aktivecon de radiumbromido malflua, kaj ankaŭ solvita en pli ol milfoje ĝia propra kvanto da akvo. Li ne trovis ian mezurablan malsamecon inter la du provoj. Tio montras ke, inter tiuj ĉi limoj, la radio-aktiveco de radiumo ne ŝanĝiĝas per sia propra grandega radieco.

Sendube ĉiuj el niaj legantoj memoras la interesan artikolon pri Radiumo, de Sir William Ramsay, en la Januara ESPERANTIST.

Ni plezure vidas ke niaj Belgaj amikoj tradukis tiun ĉi gravan artikolon en la Francan lingvon, kaj ĝin presigis en "Annales de Pharmacie."

### EL SHAKESPEARE'S SONNETS.

Ho, kiom multpli bela belo ŝajnas  
Per la dolĉeco kiun vero donas!  
Pli ĉarma brilas la ĉarmega rozo  
Naskante bonodoron en ripozo.  
Venenaj floroj ankaŭ povas brili;  
Rozkoloritaj ofte staras ili,

Dorne pendantaj, rozojn similadas,  
Kaj petolemaj somervente ludas:  
Sed ili sole por sin montri venas,  
Senname vivas kaj neniun benas—  
Dum viva rozo nutras bonodoron,  
Perfumo ĝi fariĝas, mortan horon:

ESPERANTIGIS A.M., 6266.

## LERTAJ RESPONDOJ.

Verkitaĵ de Philip de Bono (8707).

I. Kiam Frederiko II., Reĝo de Prusujo, estis vojaĝanta kune kun sia frato Henriko tra la Silesaj provincoj, kiuj antaŭ ne longe estis venkitaj, li foje vidis belegan kastelon, kiu fariĝis monaĥejo.

Li iris ĝin viziti, kaj la ĉefa monaĥo montris al la reĝo ĉiujn interesajn pentraĵojn, skulptaĵojn, kaj la bibliotekon en kiu estis multaj belaj libroj.

Kiam la reĝo estis forironta, li demandis al la monaĥo ĉu li havis bezonon ian. Li respondis, petante ke la reĝo ordenu ĉiujare du novulojn—ĉar tiatempe la ordeno estis malpermesita.

“Nu,” respondis la reĝo, “mi ĝin permesas, kaj mi mem sendos la du unuajn novulojn.”

Tiam, turninte al sia frato, li diris en la Angla lingvo, kiun li supozis esti nekomprenbla al la monaĥo: “We will send these holy men a couple of asses” (“Ni sendos du azenojn al tiuj ĉi sanktuloj.”)

Kiam la monaĥo estis eniranta en sian veturilon, la monaĥo, kiu komprenis tiun ĉi frazon, respektive diris: “Mi antaŭmetas alian peton, Via Reĝo Moŝto. Ĉu Vi permesos ke ni donu al tiuj ĉi du novuloj, kiujn Vi sendos al ni, Vian nomon, kaj tiun de Via frato?”

II. Foje, ĉe la ĉiujara ekzameno en unu el la ĉefaj lernejoj en Dorsetshire, lerta knabo demandiĝis de la direktoro:—

“Ĉu vi scias iajn el la efikoj produktataj de varmeĉo kaj de malvarmeĉo?”

“Jes, Sinjoro, tiu etendiĝas kaj tiu ĉi kuntiriĝas.”

“Nu, mia knabo, vi bone respondis. Ĉu vi ankaŭ povos doni al mi ekzemplon?”

“En la somermezo la tagoj estas la plej longaj, kaj en la vintro la plej mallongaj.”

## MALTAJ PROVERBOJ.

1. Kisu la manon, kiun vi deziras tranĉota.
2. Ne estas rozoj sen dornoj.
3. Oni ne mezuras homojn per piedoj.
4. La aero havas sian okulon, kaj la muro havas sian oreilon.
5. La bovon oni ligas per liaj kornoj, la homon per lia vorto.
6. Tiu, kiu aĉetas fiŝojn en la maro, manĝos ilin putraj.
7. Nova najlo formetas la malnovan.
8. Pli forta estas la parolo de Maltano, ol la parolo de la reĝo.

(8108).

## FABLOJ.

*La Lupo kaj la Ŝafido (La Fontaine, Libro 1; fablo X).*—La rajto de la plej forta estas ĉiam la plej bona. Ni tion volas montri tuj.

La ŝafido trinkis el fluo de pura akvo. Alvenis malsata lupo, kiu serĉis aventuron, kaj kiun malsato allogis en tiujn lokojn.

“Kiu ĉin tiel maltimigis malklarigi mian trinkaĵon?” diris tiu besto furioze; “Ĉi estos punata pro ĉia maltimego.”

“Sinjoro majesto,” respondis la ŝafido, “Via Lupa Moŝto ne koleriĝu, sed plivole rigardu, ke mi trinkas el la fluo pli ol dudek paŝojn pli malsupre, kaj ke mi sekve nepre ne povas malpurigi vian trinkaĵon.”

“Ĉi malpurigas ĝin,” rediris tiu kruela besto, “kaj mi scias ke ĉi de mi malbone parolis pasintan jaron.”

“Kiel mi estus ĝin farinta, ĉar mi ne estis naskita; mi ankoraŭ mamnutriĝas je mia patrino.”

“Se ne estas ĉi, estas do ĉia frato.”

“Mi havas nenian.”

“Estas do iu el la ĉiaj; ĉar vi ne ofte indulgas min, vi, viaj paŝtistoj kaj hundoj. Tion oni diris al mi; mi devas venĝi min.”

Tiam en la fundon de la arbaroj la Lupo forportis kaj manĝis ĝin sen alia procesformo.

Tradukis H. BOUCON.

*La Vulpo kaj la Leono (Esopo).*—Vulpo, kiu neniam ĝis tiam vidis leonon, estis tiel terurigita je la unua fojo kiam li renkontis unu, ke li preskaŭ mortis pro timo. Kiam, tamen, li renkontis lin je la dua fojo, kvankam li ankoraŭ tre timis, li ebligis kaŝi sian timecon. Sed, kiam li vidis lin la trian fojon, Vulpo fariĝis tiel kuraĝega, ke li ekmarŝis al li, kaj maltime demandis: “Kiel vi sanas?”

Troa kutimiĝo naskas malestimon.

(6266).

Kampara paroĥestro foje sciigis la aŭdantaron jene: “Ĉar estas tiom da infanetoj, ili estos baptataj je ambaŭ finoj tiun ĉi posttagmezon.”

Dum la militado en Suda Afriko, maljuna virino eniris kamparan butikon dum varmega vetero.

La butikisto diris: “Ĉu ne estas malbonege pri tiu ĉi militado!”

La maljunulino respondis: “Jes, sed ili havas por ĝi bonan veteron!”

8276.

# LA MILITAJ REKRUTOJ EN ITALUJO.

Origine verkita de CLARENCE BICKNELL.

En Italujo ĉiujare kelkaj el ĉiuj dudekjaraj junuloj estas lote elektitaj por la milita servado, kiu daŭros dum du aŭ tri jaroj. Kelkaj estas liberigitaj, ekzemple la sola filo, aŭ la dua filo se la unua jam servadis, kaj nature ĉiuj, kiuj havas ian korpan difekton.

Antaŭ la tago de la loteltiro, tiuj ĉi junuloj el la sama urbo aŭ vilaĝo elektas prezidanton kaj kasiston. Tiu ĉi tenas la monoferaĵojn, po ĉirkaŭ dek frankoj, kaj tiu determinas la detalojn por la venontaj festoj. La antaŭan tagon ĉiuj kunvenas matene, kaj eble trinkas glason da vermo, la plej estimata el la likvoroj, almenaŭ en norda Italujo, kaj poste ili kunpasas la tutan tagon kantante kaj kriegante. Ofte ili luas gurdon, kaj en la salonoj, kie la eniro estas permesita, ili dancas ĝojege. Fremduloj kiuj aŭdas la bruegon la tutan tagon, kaj vidas la duonfrenezajn junularon, kredas ke ili estas Italaj "Hooligans," aŭ duonebriaj. Sed en Italujo estas malmulte da ebruloj, kaj la junuloj malofte trotrinkas, kaj eĉ trinkinte tro da vino ili ne iĝas malpacaj kaj malbonaj, sole gajegaj.

Sed pliofte ili luas omnibuson aŭ fiakron, aŭ iras vagonare al la proksimaj urboj.

Morgaŭ ili ĉiuj iras urbdomon, kie prezidas la urbestro, kaj tiam laŭ ordo alfabeto, ili eltiras numeron el urno.

Tiu, kiu eltiras altan numeron estas certe "savita," kiel oni diras, sed kiu tiras la plej malaltajn numerojn devos certe servadi.

Finiginte la eltiron, ĉiuj foriras kun la biletoj de siaj numeroj metitaj sur la ĉapeloj, kaj kuntagmanĝas. Poste ili rekompencas la hieraŭajn amuzojn, sed pli freneze, ĉar tiuj, kiuj eltiris bonan numeron saltas kaj kantadas je ĝojo, kaj la aliaj faras same por pli bone kaŝiaŭ forgesi siajn ĉagrenojn.

La trian tagon ili faras preskaŭ same, post kiu la monoferaĵoj estas elpezitaj, kaj certe la junuloj,

lacaj kaj raŭkaj pro la kriegado, kantado, kaj senĉesa babilado, estas enuitaj.

Sed post du aŭ tri monatoj, venas la tago por la vizito al la kuracisto, kaj ree la bando, eĉ tiuj, kiuj ne iros al la servado, kunripetas la festojn dum tri tagoj.

Laŭ mia opinio kaj observadoj, tiu ĉi sistemo de deviga milita servado estas tre bona. La disciplino plibonigas kaj edukas la junulojn, precipe tiujn el la kamparo.

Dum la unuaj monatoj ili nature iom suferas, sed poste ili ĝuas la vivadon kune kun tiom da samaĝaj kameradoj. La junaj militistoj estas ĉiam kaj ĉie estimataj, eĉ amataj. Ili vidas belajn urbojn, aŭ konatigas kun la montoj: ofte la nordanoj estas senditaj al la sudaj provincoj, kaj la rekrutoj el la malpli civilizitaj sudaj provincoj venas norden.

En la teatroj kaj en aliaj lokoj de amuzoj, la militistoj nur pagas duonpreze, sekve oni vidas ilin la dimanĉojn en la teatroj, kie ili, po malpli ol unu ŝilingo, pasigas tri aŭ kvar horojn trankvile aŭskultante al bonega muziko, kaj al famaj kantistoj. Kaj, post la finiĝo de la servado, ili ĝuas la memorojn pri la estinteco, kaj ĉie renkontas amikojn, ĉar la jaroj de la servado estis por ili kiel la niaj pasigitaj en lernejo, kolegio, aŭ universitato.

La plej popolara kanto el ĉiuj verkitaj dum la jaroj de la militado por la memstareco de Italujo, estas "*La adiaŭ de la Memvolulo al lia Amantino.*" Tiun ĉi la rekrutoj kaj la rekrutotoj konas kaj kantas tre energie, kvazaŭ ili mem estas forirontaj bataladi. La advokato, Carlo Bosi, la verkinto, skribis: "Mi venas por diri adiaŭ" ("Io vengo a dirti addio") sed subite la popolo ŝanĝis la unuan linion, kaj la aŭtoro volonte akceptis la korektaĵon. Nun ĝi komencas "Adiaŭ, ho belulino!" ("Addio, mia bella, addio.")

Jen estas la laŭvorta traduko.

## LA ADIAŬ DE LA MEMVOLULO AL LIA AMANTINO.

Adiaŭ, ho belulino!

L'armeo al la fronto

Foriras; se mi haltus,

Eterna estus honto.

Ne ploru! mi spereble

Revenos, ho anĝelo!

Aŭ, en batal' mortinte,

Vin vidos en ĉielo.

La glavon, la pafilon,

Mi portas, kaj pistolojn;

Je l'sunleviĝ' mi diros

La adiaŭparolojn.

Militi mi ne iros

Kontraŭ patrujaj bandoj!

Sed la fremdulojn peli

El la Italaj landoj.

De longe per tiranoj

Ni estas suferantaj;

Mi iras Lombardion

Kontraŭ la subpremantoj.

Ho! la pasioj estas

Tururaj; sed la morto

Por gajni liberecon

Estos belega sorto.

Kun tiom da aliaj

Mi ankaŭ mortos—eble—

Sed ne maltrankviliĝu!

Mi mortos honoreble.

Se mankus la novaĵoj

Pri via vir' amanta,

Per kuglo mortigita,

Ne estu sopiranta.

Mi ne vin lasos sole;

Ĉar restos la trezoro;

Kaj li sin konsolados;

La fil' de mia koro.

Turnestron mi surmetis,

Per tuta prepareco!

Mi, vir' kaj militisto!

Vivu la libereco!

Jen! la trumpet'! l'armeo.

Foriras; ne min tenu!

Al filo kison donu,

Kaj libereco venu!

## LA VIRO VERDA.

Originale verkita de EDWARD METCALFE, M.A. (Oxon).

Estis en la preĝejo de malgranda vilaĝo, ke mi renkontis la lamulon.

Mi ekzamenadis iom atente la eksteraĵon de bela antikva kesto. Subite li diris: "Tiu ĉi kesto ĉiam rememorigas al mi la plej strangan episodon de mia vivo:—tiel stranga, ke mi timas ĝin rakonti, ĉar mi estas preskaŭ certa, ke neniu povos ĝin kredi."

Kompreneble mi tuj certigas lin pri mia kredemo.

"Sendube," li diris, "vi rimarkis la kastelon. Estas tie tre granda ĉambrego. De longe oni nomas ĝin 'La Fantoma Ĉambro,' ĉar oni diras, ke fantomo tie promenadas tute verde vestita, pro kio oni donas al li la nomon de 'La Viro Verda.'"

La muroj estas de grandega dikegeco, ĉar la kastelo estas tre, tre antikva; enkadraĵoj el nigra kverko tute kovras kaj kaŝas tiujn ĉi murojn. La netapiŝita planko estas el la sama materialo, kaj antaŭ kelkaj jaroj oni tute malplenigis la ĉambregon je la meblaro. La pordo troviĝas ĉe unu ekstremaĵo de la ĉambro, kaj enirinte, oni havas je la dekstra mano, kvin altajn fenestrojn; sed ekstere la densa foliaro de multaj grandaj arboj malhelpas eniri la lumo, cetere, sur la vitroj mem estas grandaj blazonŝildoj.

Ĉambregon pli malgajigan mi neniam vidis, nek ĉambregon pli konvenan por tia vizitanto.

Mi tute forgesas, pro kio mi estis enirinta en la ĉambregon, sed, kiam komenciĝas la historio, mi estas ĉe la flanko plej malproksima de la pordo.

Subite mi aŭdis ĉu arĝentan sonorilon?

Ne pli klara kaj pura estas la voĉo de la Sinjorino.

La pordo malfermiĝas; tra la malfermaĵo vidiĝas la terurigaĵaj vizaĝoj de la servistaro, kaj, kiel radio de lumo, dancema, gajema, ŝi eniras nia kara Sinjorino, kiu tuj ekridis tutkore la tutan fantomaron.

Fermante la okulojn, mi revidas ŝin; kaj denove mi aŭdas la ridantan belan voĉon: "Ho! Malsaĝuloj, kion vi timas? Estas nenio tie ĉi." Tiam per mokema voĉo ŝi aldonas: "Se la Viro Verda vere ekzistas, mi donas al li la inviton, ke li dancu nun kun mi.

Ho, teruraĵo! Kiel respondo je ŝiaj vortoj, en la ĉambro aperas la Viro Verda mem.

Sammomente la pordo bruege fermiĝis: kaj la fantomo kaj la Sinjorino restas vizaĝo je vizaĝo kaj mi vidas kvazaŭ rebrilatan do ŝiaj vangoj la verdecon de lia antikva vesto.

Kvankam treege paliĝinta, ŝi tamen per kuraĝa mieno gentilege lin salutis, kaj per mallerta movo li redonis la saluton. Li etendas la manon, kaj kiel ensorĉata, ŝi ĝin prenis.

Tiel mi estis terurigita, ke unu momenton mi restis tute senmova. Tiam, por tiel diri, mi vekigis el la sonĝo, kaj rapidas alproksimiĝi. Sed mi estas lama, kaj marŝas nur tre malrapide.

Antaŭ ol mi povas alveni al ili, subite ili ambaŭ malaperas en la muron. Vane mi frotis la okulojn. Nek la Viro Verda, nek la Sinjorino estas videblaj, kaj alveninte al la loko, kie ili malaperis, mi trovis nur la nerompitan supraĵon de la nigraj enkadraĵoj.

Post dudek minutoj ni sukcesis trovi kaj malfermi la kaŝitan pordon. En la dikajo de la muro estas mallarĝa tunelo, kaj flanke de ĝi ni trovis la korpon de la Sinjorino. . . ."

"Ĉu la Sinjorino estis do morta?" mi diris, rimarkante ke la lamulo silentiĝis.

"Je la momento mi ja kredas tion, sed ŝi nur svenis. Oni venigis la kuraciston, kaj li trovas ŝin babilantan pri la Viro Verda. Febro ŝin atakas, kaj ŝi iom freneziga. "La krizo estos post tri tagoj," diris la kuracisto. "Ŝi tiam havos sian planan sencon, kaj se oni povos prezenti al ŝi senduban pruvon ke la ŝajniganta fantomo nur estas, kiel mi kredas mem, mortema homo, ŝi rapide resaniĝos. Sed se ŝi ankoraŭ kredos ke ŝi vidis veran fantomon, certege ŝi mortigos."

Ve la malgaja sorto! Kiel ni povos pruvi tion? Kaj ni ĉiuj amas la Sinjorinon. . . ." "Sed la kesto," mi diris. "Kial la kesto memorigas al vi pri tio ĉi?"

"Tuj mi ĝin diros al vi," li respondis. "Ĉe tiu tempo ni havis tre kleran preĝejoteniston, veran konantulon pri ĉiuj malnovaj legendoj. Li rakontis al mi longan historion pri la Viro Verda kaj, malferminte tiun ĉi antikvan keston, li montris la vestojn, kiujn portadis la Viro Verda mem dum sia vivado antaŭ ducent jaroj: *Ili estis la vestoj mem, kiujn mi vidis portatajn de la fantomo.*

Laŭ metio, la preĝejotenisto estis ankaŭ lignajisto, kaj je la tria tago, mi havis okazon viziti lian laborejon. Ĝi troviĝis en loko tre senhoma, kien oni alvenis per vojeto trapasanta tra kampoj tute plenaj je la orafitoroj arboj de la dornstipo (*ulex europaeus*).

Alveninte mi vidis malgrandan konstruaĵon de du etaĝoj; la unua el briko, kie la lignajisto tenas sian materialon, kaj la dua, la laborejo mem, el ligno. Sed ĝi havas tiom da fenestroj, ke eble estas pli bone diri "el vitro." La pordo estis ĝuste en mezo, kaj oni supreniris per krutega ligna ŝtuparo.

Suprenirinte, mi trovis tie la lignajiston kaj lian junan lernanton; kaj mi rimarkis en la mastro

strangan maltrankvilecon. Ŝajnis al mi ke la lignajisto etas treege kolerema, kaj la junulo egale timema.

Mi komencis paroleti kelke da vortoj, sed neniam mi finis la frazon. La lignajisto rigardis min, kaj laŭ la rapideco de fulmo mi ekkonis du faktojn:—*la okuloj estas la okuloj de la Viro Verda ; ili estas ankaŭ la okuloj de frenezegulo.*

Mi ne scias ĉu mi perfekte konservis la ŝajnon de trankvileco, sed mi diris per ordinara voĉo, ke mi estas ion forgesinta, kaj ke baldaŭ mi revenos. Tiam mi adiaŭtis kaj per malrapida paŝo mi malsupreniris la ŝtuparon.

Mi jam eniras en la unuan kampon, kiam eksonas kriego freneza, kaj ĉizilo, per tre forta mano ĵetita, preskaŭ frotis mian vaugon. Ekrigadante malantaŭen, mi vidas la frenezegulon saltantan el la laborejo, kaj post li, la palan vizaĝon de la junulo, kiu rapidas lin sekvi.

Mi komencis kuri, sed, kial vi vidas, mi estas lama. Mi faletas, restariĝas, ankoraŭ faletis, falis; la frenezulo kaptas min kaj ekrukas mian korpon inter la dornplenaj arbetoj.

Prezentu al vi la aferon! Frenezegulo fortega kiel leono, kaj lamulo pro malsaneco malfortigita. Mi estis tiel senpova, kiel muso sub la ungegoj de la kato, kaj kiel kruelega kato la lignajisto ludadis je mi; jen permesante ke mi iom forkuru, jen per teruriga saltego ĵetante sin sur min.

Iafoje la muso sin savas!

Dum la lasta rulado ni aproksimiĝis malgrandan grenejon. Ĝi estas eterne fotografata en mia cerbo. Ligna ŝtuparo, la dekstra flanko tuŝanta la brikan muron, kondukis al malgranda ligna plataĵo, kie troviĝas pordo. Ĝi estis tute neuzita kaj treege malnova.

Forgesinte la lamecon, per tri saltoj mi alvenis al la plataĵo, per la forto de miaj saltoj disrompigante la putran ŝtuparon. La pordon mi trovis ŝlosita.

La frenezegulo ŝajnis iom ŝanĉeliĝi. Li levigis la falintajn ŝtupojn kaj disŝiris ilin, kiel oni disŝiras paperojn. La pecojn li ĵetis al mia korpo, sed tiel molaj ili estis ke mi ne estis eĉ vundata.

Per tiu ĉi amuzaĵo li pasigis multajn minutojn. Poste li ekvidis la flanktrabon, kiu, estante pli fortan ol la cetero de la ŝtuparo, ankoraŭ restis flanke de la muro. Tiun ĉi li forŝiras, kaj ekvidante malgrandan spacon inter la plataĵo kaj la muro, li trapasis ĝian finiĝon tra la interspaco, kaj tiris eksteren la lignaĵon per siaj tutaj fortoj—la fortoj de frenezulo.

Pli kaj pli mi sentis la plataĵon tremetanta; mi alproksimiĝis pli kaj pli forte al unu el la fostoj de la palisaro; mi aŭdis la kriegojn de la frenezegulo, la krakadon de la tremanta plataĵo; konfuzitan sonadon de multaj voĉoj alproksimiĝantaj. Tiam, kun lasta laŭta krakego, la tuta plataĵo falis teren, kaj mi nenion konis plu.

Denove la lamulo silentiĝis. “Kaj pri la Sinjorino,” mi demandis.

“Ho, la Sinjorino resaniĝis: ŝi estas mia edzino.”

“Pri la lignajisto?”

Li estis trovinta kaŝatan vojon el la preĝejo en la kastelon; antaŭe oni ofte konstruis tiajn tunelojn. Li estis tre revema kaj, per multa pensado pri la legendo de la Viro Verda, fine li kredas ke li mem estas la fantomo. Iafoje li vestis sin per la vestoj tiritaj el la antikva kesto, trapasas la kaŝatan tunelon en la kastelon, kaj jen estas la fantomo.

Jes, li loĝis kelkajn monatojn en frenezulejo, sed li ankaŭ tute resaniĝis. Hieraŭ mi vidis lin ridetantan je infanino, kies pupon li rebonigis.

Kiel mi estis savata? Ho! la junulo kuris al vilaĝo demandi helpon, kaj revenis kun granda sekvantaro.

Ĝustatempe!”

Jen estas la historio de la Viro Verda: ĉu ĝi ne estas tre, tre stranga?

## LA DEVENO DE ESPERANTO.

Tradukita el Rusa lingvo de G.V.

Vidu la komencon sur la 79–80 paĝoj de “The Esperantist” (Marta Numero).

Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetadis ĉion senbezonan el la grammatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj. Konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur konsentos ke ĝi esprimas la donitan ideon, mi simple *elpensadis* vortojn, penante, ke ili estu kiel eble pli mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera “interparoli” ni tute bone povas esprimi la saman

## THE BIRTH OF ESPERANTO.

Freely translated from an Esperanto version of a Russian letter written by Dr Zamenhof, by John Ellis.

“This is an appropriate place for me to say a few words about the material for the dictionary. Much earlier, when I had examined and rejected every non-essential from the grammar, I had desired to exercise the principles of economy in respect of the word-material also. Thinking that it was a matter of indifference what form any particular word took, so long as it was agreed that it should express a given idea, I simply invented words, taking care only that they should be as short as possible, and did not contain an

ideon per ia ekz. 2-litera "pa." Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de difinita vorto (ekz. *a, ab, ac, ad, . . . ba, ca, da, . . . e, eb, ec, . . . be, ce, . . . aba, aca, . . . k t.p.*).

Sed tiun ĉi penson mi tuj forĵetis, ĉar la provo kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkigis, ke la materialo por la vortaro devas esti Romana-Germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia—kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama *lingue universala* kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo, kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de Decembro 1878 ni ĉiuj kun solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

"Malamikete de las nacjes  
Kadó, kadó, jam temp' está!  
La tot' homoze in familje  
Konunigare so debá."

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: "Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuigi devas").

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo.

Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de Decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn

unnecessary number of letters. Instead of using "interparoli" (to converse), a word of eleven letters, why should we not express the idea just as well by some word of two letters, say, "pa"? So I simply wrote the shortest and most easily pronounced mathematical series of conjoined letters, to each factor of which series I gave a certain meaning (*e.g., a, ab, ac, ad, ba, ca, da . . . ; e, eb, ec . . . ; be, ce . . . ; aba, aca. . . etc.*).

"But I immediately rejected this notion, for my own personal experiments proved that these invented words were very difficult to learn, and even more so to remember. I came to the conclusion that the material for the dictionary must be Romance-Teutonic, altered only so far as regularity and other important requirements of language demanded. Standing upon this ground, I soon observed that the present languages possessed an immense supply of words already international, with which all the nations had a prior acquaintance, and which formed a veritable treasure house for the future international language—and, of course, I utilised this treasure.

"In 1878 the language was more or less ready, although there was a good deal of difference between my *lingue universala* of that date and the present Esperanto. I told my fellow-students about it—I was then in the 8th Class of the gymnasium—and the greater part of them were attracted by the idea, and struck by the unusual easiness of the language, began to study it. On the 5th of December, 1878, we united to celebrate the birth of my language by a solemn festival. During the feast there were speeches in the new language, and we enthusiastically sang a hymn the commencing words of which were as follows:—

which being interpreted into English, 'May the enmity of nations fall away, fall away, for the hour is come! All mankind must become as one family.'

"On the table, in addition to the grammar and dictionary, lay some translations in the new language.

"And thus the first stage of my language came to an end.

"I was then still too young for my work to appear before the public, and I decided to wait five or six years longer, and during that time to carefully test my language and to work it out fully and practically. Half a year after the feast of December 5th, 1878, we finished our course at the gymnasium and separated. The future apostles of the new language made some attempts to discuss 'the new language,' but, meeting with the ridicule of their elders, forthwith renounced it,

kaj persekutojn, mi dididis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron.

Dum kvin kaj duono da jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo—la jaroj de studento—pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min la fremdulo, sopiris kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj (“Mia penso”) mi metis poste en la unuan eldonitan de mi broŝuron; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, ĉe kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis, komprenebla, stranga kaj nekomprenbla.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon—kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike.

Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio “je,” la elasta verbo “meti,” la neŭtrala, sed difinita finiĝo “aŭ” k.t.p. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn.

En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas al la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; la praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekaptoblan “ion,” la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan “*spiriton*.”

Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte *pensi* en la lingvo neŭtrala.

Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare

and I remained in a glorious minority of one. Foreseeing nothing but scoffing and persecution, I decided to hide my work from the eyes of all.

“For five and a-half years whilst I was at the University I never spoke to anyone about it. That was a very trying time for me. The secrecy tormented me. Compelled to carefully conceal my thoughts and plans, I went scarcely anywhere, took no part in anything, and the most enjoyable time of life—the student-years—was, for me, the saddest. Sometimes I endeavoured to find distraction in society, but I felt myself a stranger, sighed and went away, and from time to time eased my heart by writing poems in the language I was elaborating. One of these poems, ‘Mia penso,’ I afterwards inserted in the first brochure which I published; but to those readers who were unacquainted with the circumstances under which they were written the verses would appear strange and incomprehensible.

“For six years I worked at perfecting and testing my language, and it gave me plenty of work, although in 1878 I had thought that it was quite ready. I made many translations and wrote original works in it, and severe trials showed me that what I had considered to be quite finished in theory was nevertheless not ready for practical use.

“There was much to lop, alter, correct, and radically to transform. Words and forms, principles and postulates, jostled with and opposed each other, whereas in theory, taken separately and not subjected to extended tests, they had appeared to me perfectly good. Such things, for instance, as the indeterminate preposition ‘je,’ the elastic verb ‘meti,’ the neutral termination ‘aŭ,’ etc, possibly would never have entered into my head if I had proceeded only upon theory. Some forms which had appeared to possess a wealth of advantage proved in practice to be nothing but useless ballast, and on this account I discarded several unnecessary suffixes.

In 1878 it seemed to me that it was sufficient if my language possessed a grammar and a dictionary; its heaviness and want of grace I attributed only to the fact that I did not know the language sufficiently well; but practice ever more and more convinced me that a language requires in addition an indescribable something, a uniting element, giving to it life and a defined and unmistakable spirit.

“I therefore began to avoid making literal translations, and made an effort to *think* in the neutral language.

Later I noticed that the language with which I was occupied was ceasing to be a shadowy reflection of the language from which I happened to be translating, and was becoming imbued with its own life and invested with a spirit of its own, and

esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: "Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo." Sed ĉar la "mondo" ne estas ebla sen antaŭaj apartaj "unuoj," la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne.

Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon—alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia "ŝlosilo," kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj elementoj. Tiu ĉi ŝlosilo, tute memstara kaj alfabete ordita, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian Esperantan leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro de mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro ("D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro") kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolan praktikon de la vivo, la financon demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine—rifuzis.

Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en Julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj." Mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan, trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familo; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj . . . mi transiris Rubikonon.

acquiring a physiognomy properly defined, clearly expressed, and independent of any other influence. My speech flowed of itself, flexibly, gracefully, and totally untrammelled, just as my living native tongue.

"Yet another circumstance compelled me to postpone for a long time the appearance of my language; for many years another problem of immense importance to a neutral language had remained unsolved. I knew that everyone would say 'Your language will be of no use to me until the world at large accepts it, so I shall make no use of it until everyone else does.' But since the world at large is composed only of its units, my neutral language could have no future until it was of use to each separate unit independently of whether the world at large accepted it or not.

This problem I considered for a long while. At last the so-called secret alphabets, which do not necessitate any prior knowledge of them, and enable any person not in the secret to understand all that is written if you but transmit the key, gave me an idea. I arranged my language after the fashion of such a key, inserting not only the entire dictionary but also the whole grammar in the form of its separate elements. This key, entirely self-contained and alphabetically arranged, enabled anyone of any nationality to understand without further ado a letter written in Esperanto.

"I had left the University and begun my medical practice; I began to consider the publication of my labours. I had prepared the manuscript of my first brochure, 'an International Language, by Dr. Esperanto,' and sought out a publisher. And here for the first time I met that bitter practicality of life, the financial question, against which I had and still have to fight yet the more. For two years I looked in vain for a publisher. And when indeed I had found one he spent half a year in preparing my brochure for publication, and finally—refused.

At length, after strenuous efforts, I succeeded in publishing the brochure myself in July, 1887. Before I did so I was much perplexed—I felt that I stood before the Rubicon. Having once published my brochure, retreat would be impossible, and I knew what kind of fate attends a doctor who is dependent upon the public, if that public comes to regard him as a visionary, or a man who busies himself with side issues. I felt that it was staking my whole future peace of mind, my livelihood, and that of my family, but I could not abandon the idea which had entered into my body and my blood, and . . . I crossed the Rubicon."

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF.



[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 0266.]

(Vidu la kvin antaŭajn Nrojn.)

## AKTO I.

## SCENO 2 (daŭrigo).

ARIELO.— En Algerlando.  
 PROSPERO.— Ho ! vi tion scias.  
 Monate al vi devos mi rediri  
 La staton tiam vian ; vi forgesas.  
 Pro multaj krimoj kaj teruraj sorĉoj  
 Ne kompreneblaj por l'animo homa,  
 L'inferan sorĉistinton Sikorakson  
 Devigis tuj foriri l'Alĝeranoj—  
 Nur ĉar ne volis ili ŝin mortigi.

ARIELO.— Jes, mastro.  
 PROSPERO.— Nubokula sorĉistino !  
 Gravedan la maristoj ŝin forlasis  
 Ĉi tie ! kie vi—laŭ via diro  
 Nun mia sklavo—tiam ŝin obeis !  
 Sed, tro aera vi, spirito, estas  
 Por ŝiajn abomenojn nepre fari :  
 Senlime furioza Sikorakso,  
 Per helpo de rimedoj potencegaj,  
 En tago, vin—al ŝi malobeintan—  
 Enfermis en fendaĵon de pinarbo.  
 Nu ! tie vi suferis dekdu jarojn ;  
 Dum tiu tempo Sikorakso mortis,  
 Lasinte vin por ĝemi, akre krii,  
 Rapide, muelile, tra la ventoj !  
 Ankoraŭ estis la insult' senhoma,  
 Krom bestoforma la sorĉistinito. . . .

ARIELO.— Ĝi estas Kalibano.  
 PROSPERO.— —Bestegulo !  
 Lin dresis mi por la domoservado—  
 Senĉesaj, dume, krioj viaj kaŭzis  
 Kriegi lupojn, eĉ kortuŝis ursojn. . . .  
 Infera turmentego ! Sikorakso  
 Ĝin povis ne forigi.—Sed mi venis,—  
 Aŭdinte vin, la pinon oscedigis . . .  
 Magie mi vin savis.

ARIELO.— Dankon, mastro !  
 PROSPERO.— Se nun vi remurmuros, mi tuj fendos  
 Trunkegon kverkan kies tuberaĵoj  
 Englutos vin por krii dekdu vintrojn !

ARIELO.— Pardonu, mastro ; mi estos obea,  
 Kaj spiritaĵon mian de nun faros  
 Ĝentile.

PROSPERO.— Agu tiel ; post du tagoj  
 Vi liberigos.

ARIELO.— Nobla mastro mia !  
 Mi kion faros ? kion ? diru, kion ?

PROSPERO.— Foriru ; mara nimfo vi fariĝu,  
 Sed, krom por mi, por ĉiuj nevidebla.

Rapidu ĝis vi estos tiaforma,  
 Kaj tien ĉi revenu ! (Malaperas Arielo).  
 (Larite al Mirando). Kara koro !  
 Mirando, vi vekigu ! ho ! vekigu !  
 Bonege jam vi dormis ; nun, vekigu !

MIRANDO.— Rakonto stranga via al mi kaŭzis  
 Profundan dormon.

PROSPERO.— Tion de vi skuu.  
 Nun, iru ni viziti Kalibanon :  
 Neniam li respondon bonan donas.

MIRANDO.— Li terurega estas malbonulo :  
 Ne amas mi lin vidi.

PROSPERO.— Sed, filino,  
 Lin ni bezonas. Fajron ekbruligi,  
 Alporti lignon, kaj balai ĉambron,  
 Utila certe estas—Kalibano !  
 Ho, sklavo, ŝlimo, kie vi kaŝiĝis ?

KALIBANO.— (El interne) Lignaro jam interne estas.

PROSPERO.— Venu !  
 Alian faron tuj mi al vi donos :  
 Testudo, venu !  
 (Reaperas Arielo akvanimfoforma).  
 Bele, Arielo ;  
 (Mallarite) Aŭskultu bone.

ARIELO.— Faros mi, sinjoro ! (malaperas).  
 PROSPERO.— Venena sklavo, sorĉa diablido,  
 Tuj venu tien ĉi ! (Venas Kalibano).

KALIBANO.— Malsana roso  
 De Sikorakso ŝlime balaita  
 Per korva plumo, sur vin nun ŝprucigu !  
 Sud-okcidenta vento vin aknigu !

PROSPERO.— Pro tio, certe, vi, hodiaŭ nokte,  
 Suferos streĉojn, flankpikaĵon sentos—  
 Elspiron haltiganta vizitisto !—  
 Eĉ erinacoj sur vi ekzercigos ;  
 Mieltavole estos vi pinĉita :  
 Pli pika ĉiu pinĉo ol abelo !

KALIBANO.— Mi nun bezonas la tagmanĝon mian :  
 Al mi l'insulon rajte apartenas ;  
 Ĝin mi heredis de patrino mia,  
 Ĝis de mi vi forŝtelis la posedon.  
 Unue vi karesis min, eĉ ofte  
 Vi akvon berogustan al mi donis,  
 La grandan kaj malgrandan lumojn  
 montris  
 Brulantajn tage, nokte ; al mi diris  
 Iliajn nomojn. Mi vin amis, tiam,  
 Kaj montris al vi la insulajn ecojn,  
 La froŝajn fontojn, fruktodonan landon,  
 Malbeno ! salajn lokojn kaj herbejojn. . . .  
 (Daŭrigota).

## CORRESPONDENCE NOTES.

The Editor desires to thank numerous correspondents for their most valuable and interesting views on the Accent Question.

It will be recollected that April 10th is the last day for receiving votes on the matter, and it is hoped that all friends wishing to do away with the accents will kindly send their postcards before that date. As was anticipated, up to the present more replies have come to hand against the proposal than for it. It will naturally be supposed that those readers not sending any reply are in favour of the continued use of the accents. In the May gazette the question will be decided. It is somewhat early to prophesy, but unless a remarkable change sets in, the future ESPERANTISTS will be as their predecessors.

Two correspondents have sent queries as to written Esperanto. This, of course, is the same all the world over. Russians do not attempt to use their own characters, neither do Chinese try to write picture Esperanto. Were this otherwise, we should all, to a large extent, be wasting our time over the study. Let our two friends take courage, and at once enter into correspondence with Russian Samideanoj.

Will some Esperantists in Accrington, Sheffield, and Ventnor kindly assist blind students to master the language? Help in this direction will be greatly appreciated.

Several adepts have expressed willingness to correct letters of less experienced students, provided stamped envelopes be enclosed for the reply. Will those desirous of taking advantage of the privilege send in their names to the Editor?

A.G., of Pforzheim, asks whether it is not best to omit the article, as in Latin. It is difficult to give a precise rule for English-speaking people as to when the definite article should be expressed and when omitted. Some ingenious friends have suggested the following plan, and will be glad to hear of instances in which it fails.

Whenever in English it is impossible, without impairing the sense, to use the indefinite article "a," then, in translating into Esperanto, employ "La."

A correspondent has kindly sent a valuable article on the use of the English verb "TO GET." This will be of service to our readers. Similar useful contributions are invited.

## HOW TO TRANSLATE "TO GET."

- (1). When it means "to become"—igi.  
*E.g.*—To get accustomed to }  
 " used to } = kutimiĝi je.  
 " to do (something) }  
 It is getting cold—malvarmiĝas.  
 " " dark—mallumiĝas.  
 To get beaten—batigi; blamed—mallaudiĝi.  
 " laughed at—mokiĝi; married—edziĝi.  
 " near—proksimiĝi (al); open—malfermiĝi.  
 " up—leviĝi.
- (2). When it means "to make"—igi (sometimes konsili ke).  
*E.g.*—Get him to come—Lin venigu (or konsilu al li ke li venu) (or faru ke li venu).  
 To get a thing done—Ion farigi.  
 " a house built—Domon konstruiĝi.  
 " (people) together—Kunveniĝi.  
 You will never get him to do that—Vi neniam konvinkos lin, ke li tion faru.
- (3). When it means "to obtain, acquire"—akiri, aĉeti.  
*E.g.*—To get a horse—Aĉeti ĉevalon.  
 I want to get you one—Mi deziras oltrovi unu (or iun) por vi.  
 I got a prize—Mi ricevis premion.  
 To get friends—Ekhavi amikojn.  
 To get money from (somebody)—Eltiri monon el.
- (4). When it means "to fetch, bring"—alkonduki, alporti.  
*E.g.*—Get me a cab!—Alkonduku al mi veturilon!  
 Get me a glass of water!—Alportu al mi glason da akvo!
- (5). When it means "to arrive"—alveni.  
*E.g.*—To get to a place—alveni en loko.
- (6). When expletive, "got" is not translated. "I have got" is the same as "I have."  
*E.g.*—What have you got?—Kion vi havas?
- (7). With a proposition.  
 To get across—trairi; along—antaŭeniri.

To get at (something)—elakiri; away—  
foriri, forkuri.  
 „ back—reveni; back (one's ex-  
penses)—ricevi.  
 „ down—deiri, malsupreniri; in—  
eniri.  
 „ off—eliri (el), foriri (de), lasi.  
 „ on (in learning)—progresadi.  
 „ on (in business)—sukcesi.  
 „ on (in health)—sani.  
 „ out—eliri, foriri; upon (a horse)—  
supreniri (ĉevalon).

(8). Expressions.

He got run over by a horse—Ĉevalo lin  
piede subpremis.

He wants to get talked of—Li deziras ke  
oni parolu pri li.

Get on with your work and never mind  
what I am doing—Daŭrigadu vian  
laboron, kaj ne zorgu pri tio kion mi faras.

NOTE.—In all cases when “to go” is used with  
the same meaning as to get, the translation would  
be the same as in the above.

E.g.—To go across—trairi.

## LA IMPRESO KIUN FARIS JE MI LA PARLAMENTEJO.

Originale-verkita de E. A. Lawrence.

Post multaj tagoj mi recevis mian biletan. La lokoj estas malmultaj kaj mi devis longe atendi, sed fine mi ja havis la tiel deziritan okazon, sed, Ho ve! mi havas teruran kapdoloron. Tamen mi decidis ĉeesti.

Prezentante min ĉe la pordego, ne estis necese ke mi demandu la vojon, ĉar, estante fraŭlino, policano demandis: “Ĉu vi serĉas la Galerion de Sinjorinoj?” Mi jesis, kaj li kondukis min al komforta levilo, kiu min levigas tri aŭ kvar etaĝojn, al la supra Galerio.

Tie ĉi troviĝis kelkaj Sinjorinoj, atendantaj, sur benkoj sidantaj, ekster la ŝlosita pordo de la *Sankta Kafo*—ne ekzistas alia nomo por ĝi—de kie la beletaj birdoj aŭ aliaj povos rigardadi, tra la ferme plektataj baroj, siajn amikojn de la privilegita sekso, kiuj klopodas pri la regadaj zorgoj.

Mi estis tre feliĉa, ĉar mi povis iri tute proksime al la baroj, kaj mi vidis grandan altan Ĉambregon. Longa, librokovrita tablo troviĝis en la centro.

Sidejoj estis aranĝitaj en longaj vicoj, ambaŭ-flanke de la ĉambrego. La registara partio okupis tiujn je la dekstra flanko, kaj la Kontraŭmetuloj estis je la alia.

Je unua vidiĝo, niaj leĝfarantoj ne ŝajnas esti tre okupaj; tie ĉi sidas unu, kun ĉapelo klinigita super la frunto, kvazaŭ li kviete dormetas post la tagmanĝo; tie staras du aŭ tri kunparolantaj.

Subite la pordo malfermiĝas, kaj oni aŭdas per forta voĉo elkriata: *La Parolanto* (The Speaker).

Baldaŭ eniras la Bastonportanto (Mace Bearer) per velura pantaloneto kaj nigraj strumpfoj vestita. Li portas la gloran Bastonon, kun ĝia krono al la pinto.

Poste venas la Parolanto vestita per sia belega Robo. Kune kun li eniras Pastro. Kion faras tie ĉi pastro? mi ekpensis. Oni fermis la pordon kaj la du viroj sidigis. La tuta Ĉambrego silentiĝas. La Membroj levigas, la Pastro komencas Diservon, konsistanta el preĝoj por Dia helpo, por la Reĝo kaj Reĝino, kaj la Patro Nia.

Vere estas tre solene.

La pordo denove malfermiĝas, kaj enrapidas multe da Membroj, ĉar nun estas la tria kaj duono, kaj la Demandoj komenciĝas je tiu ĉi horo. Kiam la Kontraŭmetuloj proponas demandojn, la aliaj ofte multe amuziĝadas. La Irlandanoj donas la plimulton da ŝercoj. Jen unu el la ŝajne enuigaj vizaĝoj limiĝas, kaj Membro kviete antaŭeniras al la tablo kaj, per malmultaj vortoj kontraŭdiras, aŭ eble klarigas la proponojn. Eble oni ridos je li, eble oni aplaŭdos.

Post unu horo, la *Ĉambro* eniras en komitaton. La Parolanto kvitas sian seĝegon, la Bastono estas sub tablo metita, kaj nun komenciĝas la ĝenerala diskutado.

Forgesinte la kapdoloron, nur la memoro, ke la vagonaro min atendas, fortiras min noktomeze, kaj mi lasas niajn leĝfarantojn ankoraŭ diskutantajn.

## ĜIS LA REVIDO.

La Redaktoro deziras sendi koregan dankesprimon al la multaj Gesamideanoj, kiuj afablege plezur plenisigis lian libertempon. Laŭ la peto de multaj legantoj, li skribos mallongan skizon pri sia pro-Esperanto vojaĝo, en la Maja numero.

## DIVERSAĴOJ.

KARA SINJORO,—Mi plezure legis en la Februara Numero de THE ESPERANTIST leteron de Esperantisto 4686 pri instruado de Esperanto al geknaboj. Mi devas sciigi vian estimatan korespondanton, ke ekzistas nun jam de kelka tempo ekmovado Esperantista inter junuloj.

Por kuraĝigi ilin al la lernado de nia lingvo estis fondita de Svisa instruisto, Sro. Ducommun, internacia korespondado de gejunuloj, kiu nun havas korespondantojn en diversaj landoj. La junaj Esperantistoj tiel perfektigas en la lernado de la lingvo, konatiĝas kun alilandaj samaĝuloj, kaj povas interŝanĝi kun siaj malproksimaj amikoj poŝtkartojn, signojn, fotografiaĵojn, k. t. p.

Mi plezure sendos pluajn sciigojn laŭ peto.—Via,  
H. HODLER,  
9 Av des Vollandes, Geneva.

Pri tiu ĉi letero, ni ankaŭ ricevis alian respondon de Angla Instruisto :

KARA SINJORO,—La knaboj interesiĝas treege je la lingvo, kaj, kvankam mi ne estas povinta aranĝi multe da tempo por ĝi, ili faradas bonan progreson, kaj jam skribas leterojn en Esperanto. Certe, ili preferas Esperanton antaŭ Franc-aŭ-German-lingvoj, kvankam ni instruas tiujn ĉi per la metodoj modernaj kaj interparoladaj.

Dro. Zinovjev afable skribis el Aluŝta, Rusujo, la sekvantan :

KARA SINJORO,—THE ESPERANTIST, per sia diversema kaj viva karaktero, promesas fariĝi la plej interesa inter Esperantaj ĵurnaloj. La sortoj de Esperanto (kies ano kaj servisto mi fariĝis de la tempo de ĝia naskiĝo) prezentas sin al mi garantitaj de kiam ili falis en fortaj manoj de Angloj kaj Amerikanoj. Inter diversaj demandoj ondigantaj la homaron, mi preskaŭ ne trovas pli belan, pli seriozan, kaj ampleksan, ol tiu de lingvo internacia. Gloro, laŭdo kaj kunsento al tiuj, kiuj varbiĝis je nobla servado al ĝi. Akceptu atoston de miaj vere simpatiaj sentoj.

La unua raporto de la Grupo Esperantista en Le Havre ĵus eldoniĝis, kaj enhavas longan priskribon pri la vizitoj de alilandaj Geesperantistoj dum la lasta jaro. Tiuj ĉi, oni diras, plene atestas je la elparolebleco de Esperanto.

Kompreneble ni ĉiuj esperas ke la interparolado de la lingvo inter anoj de diversaj landoj baldaŭ fariĝos ĉiutaga afero, sed, nuntempe, ni danke akceptas le kritikon de niaj sindonemaj Havraj gesamideanoj, kiuj eble havas la plej grandan sperton el ĉiuj pri tiu ĉi demando.

Sro. de Beaufront skribis al Sro. Motteau pri la Esp-Ang. Vortaro :

KARA AMIKO,—Grandegan ĝojon donas al mi la apero de via Vortaro, ĉar, kiel vi scias, mi ĉiam diris kaj ripetis, ke la Angloj estos por ni fortonetakebla.

Nun ili estas armitaj kaj, ĉar mi konas ilian karakteron, mi tre bone scias, ke ili senhalte, potence kaj eĉ mirinde kunhelpidos al la triumfo de nia ideo, kiam ili ĝin konos ankoraŭ pli bone.

Tre koran dankon pro via verko bonega kaj klarega.

(Sro. Motteau afable permesis ke mi enpresigu tiun ĉi interesan kritikon pri la bona verko.—Red.)

La Grupo Esperantista de Alĝero kaj de la Norda Afriko intencas organizi karavanan por ĉirkaŭ tridek ĉiulandaj turistoj. Tiu karavano vizitus la plej interajn lokojn kaj pejzaĵojn en Alĝero, kaj estus bona pruvo pri la facileco de interparolado de Esperanto inter personoj de diversaj lingvoj.

La karavano okazos ĉirkaŭ la monato Majo, kaj kostus, mara transiro (per Marseille) enhavanta, de 500 ĝis 600 frankoj, laŭ la klaso de la mara vojaĝo (£20—£24).

Detalaj sciigoj estos sendataj laŭ petoj. Skribu al 17, Boulevard Gambetta, Algiers.

Nia agema samideano, Sro. Gasse, el Havro, ĵus eldonis novan Gazeton : “*Revuo Universala ; Memstara organo, malfermita por ĉiuj fakoj kaj opinioj.*” Ĝi eliros almenaŭ sesonjare.

La unua Numero (Januaro) enhavas longan artikolon pri la Paca movado, kaj la tuta enhavo ĝi traktas pri tiu ĉi afero. La Revuo estas bone presita kaj ni sendu ĉiujn bondezirojn al la sindonema Redaktoro. La kosto de la jara abono estas kvar frankoj (3s. 6d.).

Longa korespondado iniciatiĝis en la *Glasgow Evening News*, kiu kredeble multe helpas la aferon. La Skotlandanoj estas tre antaŭemaj pri ĉiuj edukadaj temoj, kaj multe da ili jam donis sian aprobon je la helpanta lingvo.

Sinjoro Rowe, 51, Portland Road, Nottingham, donis kelkajn sukcesplenajn paroladojn, kaj nun klopodas pri la fondo de societo Nottinghama.

Sro. Wymms estas Hon Sekretario de nova grupo en Leeds. Sinjoro Rhodes (Keighley) afable donas helpon al la tiea afero. Oni faras ĉiusemajnajn kursojn ĉe la Northern Institute 4-5 posttagmeze.

*In order that this Gazette may be useful as a propaganda agent, it has been considered advisable to include in each number a synopsis of the Grammar of Esperanto, so that those hitherto ignorant of its system may be the better able to appreciate the magazine.*

## SYNOPSIS OF THE GRAMMAR.

The ALPHABET is composed of 28 letters. They are the following:—

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U V Z and Ŭ.

The VOWELS are always given a long sound; as in the well-known phrase, "Pa, may we go too?" Shorthand students will at once recognise them as the long vowels of "Pitman." Their sound can also be illustrated by—"Bart, Bait, Beat, Boat and Boot."

The following CONSONANTS need special attention. It must be remembered that the sounds given are invariable, because *Esperanto spelling is phonetic and each letter has only one sound*:—

|            |   |                  |                         |   |
|------------|---|------------------|-------------------------|---|
| The letter | Ĉ | is sounded as in | Czar, or as the "ts" in | Bits.   |
| " "        | Ĉ | " "              | " "                     | Church.   |
| " "        | G | " "              | " "                     | Gag; <i>i.e.</i> , the hard sound.                              |
| " "        | Ĝ | " "              | " "                     | George; <i>i.e.</i> , the soft sound.                           |
| " "        | H | " "              | " "                     | His; <i>i.e.</i> , it is aspirated and never mute as in French. |
| " "        | Ĥ | " "              | " "                     | Loch; <i>i.e.</i> , the Scotch or German "CH" or Spanish "J."   |
| " "        | J | " "              | " "                     | the English letter Y. Thus Paroloj is sounded Paroloy.          |
| " "        | Ĵ | " "              | " "                     | the French J in Bijou or the S in the English word Pleasure.    |
| " "        | S | " "              | " "                     | in Sun; never as in Rose (Roza in Esperanto).                   |
| " "        | Ŝ | " "              | " "                     | in She.   |

The English letters Q, W, X and Y do not exist in Esperanto.

The letter Ŭ is only found in diphthongs—Baldaŭ is sounded Bahldow.

The one remaining point to be mentioned is that "AJ" is the same as in By. "OJ" as in Boy.

ALL NOUNS end in O in the nominative singular. Birdo, a bird.

When the direct object to a verb, an N is added to this O. Mi havas birdon, I have a bird.

All nouns form the PLURAL by adding J to the singular. Birdoj, birds. If objective, birdojn.

All ADJECTIVES end in A and agree with the noun in number and case. Mi havas belajn birdojn, I have beautiful birds.

The INFINITIVE<sup>s</sup> of VERBS always end in I. Lerni, to learn. Pensi, to think.

PRESENT INDICATIVES end in AS in all persons singular and plural. Mi iras, I go. Ili iras, they go.

PAST INDICATIVES end in IS in all persons singular and plural. Mi iris, I went. Ni iris, we went.

FUTURE INDICATIVES end in OS in all persons singular and plural. Ŝi iros, she will go.

CONDITIONAL MOOD ends in US in all persons singular and plural. Li irus, he would go.

IMPERATIVE MOOD ends in U. Parolu! speak! Iru! go!

SUBJUNCTIVES are formed by using "KE" and the Imperative. Ke mi iru, that I might go.

The PRESENT PARTICIPLE ACTIVE ends in ANTA—Iranta, going. In the Passive voice in ATA—Farata, being done.

PAST PARTICIPLE ACTIVE ends in INTA—Irinta, having gone. In the Passive voice in ITA—Farita, having been done.

FUTURE PARTICIPLE ACTIVE ends in ONTA—Ironta, about to go. In the Passive voice in OTA—Farota, about to be done.

ADVERBS end in E—Bone, well. Bele, beautifully.

1. The DEFINITE ARTICLE is invariably LA in all cases singular and plural. La Patroj, the Fathers.

2. There is no indefinite article in Esperanto. Patro, a Father; or merely Father, as the case may be.

3. "NOT" is expressed by "NE." Mi ne havas amikon, I have not a friend.

4. Questions are introduced by "Ĉu." Ĉu mi ne havas amikon? Have I not a friend?

5. EŜTI, to be, is the auxiliary verb in Esperanto. Havi, to have, is never an auxiliary.

N.B.—There are no exceptions or irregularities in Esperanto.

The VOCABULARY has been simplified by about 30 affixes, which are used to modify the meanings of root words. The commonest are the following PREFIXES :—

**BO** indicates relationship by marriage. *Bofrato*, Brother-in-law.

**DIS** indicates separation, as in English. *Disŝiri*, to tear to pieces.

**EK** indicates the commencement of an action. *Eklerni*, to begin to learn.

**MAL** is always used to indicate OPPOSITES. *Varma*, warm. *Malvarma*, cool. *Amiko*, friend. *Malamiko*, enemy.

**RE** denotes the repetition of an action. *Relerni*, to relearn. *Rediri*, to say again.

The principal SUFFIXES are the following :—

**AĴ** signifies an object made from—thus, *Fruktaĵo*, something made from fruit.

**AR** signifies a collection of. *Arbo*, a tree. *Arbaro*, a forest.

**EBL** signifies possibility. *Videble*, visibly. *Lernebla*, learnable.

**EC** signifies an abstract quality. *Boneco*, goodness. *Beleco*, beauty.

**EG** signifies increase. It is the augmentative suffix. *Granda*, large. *Grandega*, immense.

**EJ** signifies the place where an action takes place. *Lernejo*, school. *Preĝejo*, church.

**ET** is the diminutive suffix. *Infaneto*, a little child. *Varmeta*, lukewarm.

**IG** denotes the causing of an action. *Morti*, to die. *Mortigi*, to kill.

**IĜ** denotes turning or becoming. *Paliĝi*, to turn pale. *Fortiĝi*, to become strong.

**IL** denotes the instrument by which an action is performed. *Kudri*, to sew. *Kudrilo*, a needle.

**IN** denotes the feminine. *Patro*, father. *Patrino*, mother. *Onklo*, uncle. *Onkino*, aunt.

**IST** denotes the occupation, or means of livelihood. *Botisto*, bootmaker. *Servisto*, manservant.

**UL** denotes the possession of a Quality or Attribute. *Blindulo*, a blind man. *Danculo*, a dancing man.

By means of these affixes, the Vocabulary is enormously simplified.

The Free Classes continue as usual :

Every Wednesday evening, at 6.30, The Gouin School, 34, Harrington Road, South Kensington.

Every Thursday, at 6.30, at The Gouin School, 16, Finsbury Circus, E.C. (Apply to Miss Schafer, 8, Gloucester Crescent, Regent's Park, N.W.).

Every Thursday, at The Gouin School, 16, Finsbury Circus, a Conversational Class, at 8 p.m.

Every Tuesday, at The Commercial College, Woodgrange Road, Forest Gate, E., 7.45 p.m.

For the convenience of Esperantists, all works dealing with the language can now be obtained by writing to the Librarian, P. Howard, Esq., The Bungalow, Cranes Park, Surbiton, Surrey.

The books most read are :—

"Student's Complete Textbook," by J. C. O'Connor, B.A., 1s. 8d., post free (revised edition).

"Thirty five Exercises with Keys," by A. Motteau, 1s. 3d., post free (6 copies for 6s. 6d.).

"No. 52," a short Grammar, by the Hon. R. H. Geoghegan. Price 7d., post free. This is a capital preliminary work for giving to friends to arouse their interest. For this purpose we will supply *subscribers* with 6 copies for 2s. 6d., post free.

Three Tales by Tolstoy and Pushkin, 1s. 1d.

Fundamenta Krestomatio ; Dr. Zamenhof, 3s. 4d.

"Hamlet," translated by Dr. Zamenhof, 2s.

Grammar in French or German, 1s. 6d.

Commentaire in French, 2s.

Prose Selections, 2s. 6d. and 1s. 6d.

Stories from back "L'Espérantistes," 2d. each.

"Tourist's Phrase-Book," in 6 languages, 6d.

Esperanta Sintakso de P. Fruictier, 1s. 6d.

The following monthly magazines can be obtained. The annual subscriptions are :—

"La Lingvo Internacia," printed wholly in Esperanto, 3s. 6d.

"L'Espérantiste," in French and Esperanto, 4s.

"La Lumo," in French, English, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Belga Sonorilo," in French, Flemish, and Esperanto, 2s. 6d.

"La Bohema Esperantisto," in Czech and Esperanto, 3s.

The new monthly "Internacia Scienca Revuo." Subscription 6s. per annum.

A New Hobby that may bring you a living, 7d.

Fabroj de La Fontaine ; Vojaĝo interne de mia Ĉambro ; and Advokato Patelin, 1s. each.

The English-Esperanto and Esperanto-English Dictionaries, 2s. 6d. each.

"French-Esperanto Vocabulaire," 2s. 6d. ;

"Esperanto-French Dictionnaire," 1s. 6d.

"Braille Instruction-Book for the Blind," 4s.

Translation of the above into English, 6d.

Neat star-shaped Badges, for use when travelling, are kept in stock. Price 9d. each.

No. 7.

THE

May, 1904.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagandado de la Internacia Lingvo.

Edited by H. BOLINDER-PARK HUIDE.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 centm).

PUBLISHED BY THE LONDON ESPERANTO CLUB, 41, GREAT PORTLAND, London, W.C.

## CONTENTS.

|  |        |
|--|--------|
| AN ESPERANTIST'S HOLIDAY (H.B.M.)  | 87-104 |
| TRINKAĴOJA LERNEJO (by Charles<br>Skelton)   | 104    |
| THE FISHES, continued (translated by<br>A. MICHAM)                                     | 105    |
| THE MONKEY, a Fable from Fables<br>(translated by SE MEHRMAN)                          | 106    |
| IMPACT OF TRAVELLING (by D.W.)   | 106    |
| QUINAY OF OMAR KAYFAR (verse<br>trans. by Ben King)                                    | 107    |
| MOBBY FRANK DE LORRAINE  | 108-9  |
| FROM ISHIA. A Letter and Proverbs<br>ABOUT ESPERANTO SOCIETIES (translated<br>by P.H.) | 111    |
| THE BOURNEMOUTH, an Anecdote (E. J. Dale)  | 111    |
| KOONKA'S POET (translated by C. S.<br>Skelton)   | 111    |
| CHARACTERISTICS OF   | 112    |
| MAY DAY IN ENGLAND (Miss Lawrence)   | 112    |

FOR FREE PARTICULARS write to  
the **NON-SECRETARIES** of  
**ESPERANTO SOCIETIES** at

|   |
|---|
| CORNHILL-GOS-TYNE, M. J. Longs, Esq.,<br>Trinity Terrace,             |
| DURHAM, C. Fearnley, Esq.,<br>Cath. Association, St. Stephen's Green. |
| EDINBURGH, Miss Tweedie, M.A.,<br>2, Spenser Street.                  |
| GLASGOW, J. Hunter, Esq.,<br>126, Garsley Road, Pollokshields.        |
| HUDDERSFIELD, D. H. Taylor, Esq.,<br>12, Holly Hall Road.             |
| KEIGHTLEY, J. Ellis, Esq.,<br>Compton Buildings, How Street.          |
| LEEDS, J. E. Wynn, Esq.,<br>2, Mathew Street.                         |
| LONDON, H. Bellingbrooke Munn,<br>41, Gower Temple, W.C.              |
| NEWCASTLE, D. W. Clephan, Esq.,<br>a, Elchald Terrace, Gateshead.     |
| PLYMOUTH, J. A. Tull, Esq.,<br>8, Barton Crescent, Madagawick.        |
| ST. ANDREW'S, J. T. Harton, Esq.,<br>129, South Street.               |
| TYNEMOUTH, Alan F. Davidson, Esq.,<br>26, York Crescent, N. Shields.  |
| WIMBLEDON, W. Inge, Esq.,<br>Spencer College, Wimbeldon.              |

It is a necessary legal condition with reference to these and other publications that the Non-Sec. Department shall not be held liable for any error or omission.

## The Remington THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

*Unbound by ties of nationality;  
The common bond of union of all civilized peoples.*

*The Remington can be supplied fitted for  
Esperanto.*

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

## La Remington LA UNIVERSALA SKRIBMAŜINO.

*Pripensu je tio!*

LA INTERNACIA MAŜINO.

*Tute liberigita de naciaj ligiloj -  
La Komuna unuigilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.*

*La Remington estas liverita kun Esperantaj  
presiloj.*

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

## Internacia Scienca Revuo.

THE LATEST PROOF OF OUR PROGRESS.

All should send to the Hon.  
Secretary, Esperanto Club, for a  
Specimen Copy of this splendid  
monthly.

Price 7d. sent free.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi.

- DOKTORO GUSTAV BUSUTIL, Miĝda, Malta. Pri ĉiuj aferoj, per Esperanto.  
PHILLIP DE BONO, Esq., 8 Str. Ospedale, Rabato, Malta. Interŝanĝos poŝtaĵojn.  
T. CARR, Esq., 45, High Street, Keighley, Yorks. Interŝanĝos p-k. ilus. el ĉiuj landoj.  
H. G. CHEVALIER, Esq., Post Office, Toronto, Canada. Ĉiam respondos je p-k. skribitaj en Esperanto.  
M. ALBERT CLAUDE, Sandrupt, Meuse, France. Per ilus. p-k. Kaj kun Gesamidesoj logantaj en Britaj kolonioj.  
L. R. CONNOR, Esq., 91, High Street, N. Finchley, London, N. Ĉiam respondos je Esperantaj leteroj kaj ilus. p-k.  
MISS A. A. COWAN, 30, Gauden Road, Clapham, London, S.W. Letero ad p-k. kun alilandulinoj.  
A. J. HULME, Esq., The White Studios, Castle Street, Shrewsbury, England. Kun ĉiulandaŭj pri arto kaj artmonstroj.  
A. JENNINGS, Esq., 15, Stavordale Road, Highbury, London, N. Per vidaĵkartoj kun ĉiulandaŭj.  
HERR KARL KLIN, 71 Friedrich Kaisergrasse, Vienna XVI. Vidaĵkartojn. Ĉiam respondos.  
M. G. PERRIN, 8 Rue de Rome, Calais, France. Per ilus. p-k.  
M. IVAN PETROFF, 14 S. Tzar Asen, Sophia, Bulgaria. Ilus. p-k. de monumentoj kaj longuj stratoj.  
MISS ROSE PRICE, Klopstockstrasse 52, Berlin, N.W. Interŝanĝos ilus. p-k. Kaj p-signojn.  
A. SINGLAIN, Esq., 17, High Street, New Pitaligo, Scotland. Interŝanĝos ilus. p-k. Kaj p-signojn.  
C. G. STUART-MENTEATH, Esq., 23, Upper Bedford Place, London, W.C. Precipe kun Alilanduloj pri ĝardenoj utboj. Kaj Darwinismo por malbalpi homan degeneron.  
A. F. WHITESIDE, Esq., Box 3847, Johannesburg, Transvaal, S.A. Per ilus. p-k.

La Kosto de la Enskribo estas, 6d. (70c. per poŝtaĵoj).



# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Sro. T. Čejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Sevnave, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
CANADA.—A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal.  
FRANCE.—M. Paul Fruitier, Boulevard Arago 27, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Myba, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—G. B. Smith, Esq., 18, Wilborg Quay, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelngatan, Stockholm.  
TRINIDAD.—Geo. O. Messerly, Esq., Port of Spain.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtsignon.*

*Asenklatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtsignoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

No. 7.

MAJO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

*Marto 12—15, 1904.*

*March 12—15, 1904.*

Hodiaŭ, denove sidante antaŭ la Remingtono mi skribas malmultajn vortojn pri mia memorinda libertempeto inter la Esperantistoj en Francujo. Tion ĉi mi faras por plenumi la deziron de multaj legantoj de THE ESPERANTIST. Estus facile fari unu el du aferoj—aŭ plenigi libron je la temo, aŭ nenion skribi. Por la unua, tempo mankas: la duan mi ne devas fari, ĉar mi bedaŭrinde promesis ion verki.

Mi do volas esperi, ke miaj novaj transmaraj amikoj pardonos skizon tiel mallongan pri tiel interesa temo.

Ĉu estas multaj, krom Esperantistoj, kiuj jam de longe estas havintaj longan amikan korespondadon kun tiuj, kiujn ili ankoraŭ neniam vidis? Estas eble; sed certe mi multe antaŭpensis pri tiu ĉi vojaĝeto kiu ebligus min vidi tiom da Esperantistoj, kun kiuj mi jam havis tre agrablajn interrilatojn.

Trankvila martransiro kaj komforta vagonaro permesis iom da dormo, antaŭ ol mi alvenis, je la sepa matene, en la Gajan Ĉefurbon.

Pri la vidindaĵoj kaj interesaĵoj de tiu ĉi Parizo ne estas necese skribi. Tiuj ĉi estas por ĉiuj, ne sole por la Esperantistaro.

Sed la kora akcepto, kiun donis al mi Sinjoro Gaubert, Sekretario de le Pariza Grupo, estis Esperantista privilegio. Vizitinte la eldonistojn, Sroj. Hachette, mi iris al la oficejo de la Suezana Kanalo Kompanio, kiun Sinjoro Gaubert ŝerceme nomas sia malliberejo! Vere tre luksa malliberejo. Ni en Anglujo ne havas, mi kredas, tiajn oficejojn. Tie ĉi mi ankaŭ renkontis lian kolegon, Sinjoron Massé, kiu ankaŭ estas alia Sekretario de la Grupo Pariza.

To-day, sitting at the Remington once more, I write a few words about my memorable little holiday with the Esperantists in France. I do so to fulfil the wish of many readers of THE ESPERANTIST. It would be easy to do one of two things—either to fill a book on the subject, or to write nothing. For the former, time is wanting, and I must not do the latter, having unfortunately promised to write something.

I must therefore hope that my new friends across the Channel will forgive such a brief outline of so interesting a theme.

Have many people, other than Esperantists, had long friendly correspondence with those whom they have never yet seen? Perhaps. But certain it is that I gave much forethought to this short journey, which was to enable me to see so many Esperantists, with whom I already had such pleasant intercourse.

A smooth crossing and a comfortable train allowed a little sleep before I arrived, at seven in the morning, in the Gay City.

Of the sights and interesting features of Paris it is needless to write. These exist for all, not for the army of Esperantists alone.

But the hearty welcome of M. Gaubert, Secretary of the Parisian Group, was an Esperantist privilege. Having visited the publishers, Messrs. Hachette, I went to the Suez Canal Company's office, which M. Gaubert jokingly calls his *prison*! A truly luxurious prison. We in England have not, I fancy, such offices. Here I also met his colleague, M. Massé, who is another Secretary of the Paris Group.

La unua objekto, kiu frapas la okulojn, estas bela modelego de la mondfama kanalo. Versajne estis pli facile elfosigi la sablon de la Dezerto ol tratanĉi la Panamajn montojn, tamen la grandeco de la entreprono estas tute videbla. Ni kunmatenmanĝis tie ĉi, kaj la kuirado, kiel la konstruaĵo mem, estis bonega.

Poste mi vizitis Sinjoron Fruictier, la tre agema Redaktoro de la *Lingvo Internacia*, kaj de la *Internacia Sciencia Revuo*. Post agrabla interparolado ni diris "*Ĝis la Revuo*" kaj mi foriris por renkonti Sinjoron Bourlet, Prezidanto de la Grupo Pariza.

Pri li, lia sindonemeco kaj nelacigebleco, mi kompreneble estis multe aŭdinta; kaj do estis por mi tre granda plezuro persone konatigi kun tiu ĉi afablega kumbatalantestro. Kun li estis sia kuzo, Sinjoro Mehrmann, Sekretario de la Grupo de Château Thierry. Ŝajnas ke la tuta parenkaro de Sinjoro Bourlet Esperantigis, krom unu, kiu ankoraŭ okupas sian tempon je la lernado de la Angla lingvo. Tiu ĉi estas tre prava, sed ĉu ne estus pli bone, se oni lernus la Anglan per Esperanta lernolibro? Babilante, ni malrapide promenadis al la Palais Royal. Tie alveninte, ni eniris Restoracion Vefour, kie mi eltrovis, ke oni preparis grandan festenon. Tie ĉeestis pli ol dudek kvin Samideanoj, kies nomojn mi jam konis, sed kies plimulton mi ne ankoraŭ vidis.

Mi ne povas tie ĉi nomi ĉiujn ĉeestantojn: sufiĉe ke mi diru, ke M. le Général Sébert (Membro de la Instituto), M. de Ménil (de Jarlibro famo), M. Rollet de l'Isle (kiu klopodas pri marista vortaro) kaj preskaŭ ĉiu eminenta Pariza Esperantisto ĉeestis, krom M. Cart kaj M. de Bréon, kiuj bedaŭrinde, ne povis partopreni.

Dum la vespermanĝo, niaj Samideanoj sendis koregajn salutojn al ĉiuj Britaj Esperantistoj, kaj fidis, ke ni ĉiam laboradu kune kun niaj Francaj Gefratoj por certigi la tutmondan alprenon de nia kara afero.

Kompreneble mi respondis je tiu ĉi afablega sendaĵo, kaj faris mallongan raporton pri la nuna stato de Esperanto ĉi tie, kaj ankaŭ diris, ke ni en Anglujo esperas baldaŭ atingi tiun altan lokon, kien nun estas alveninta nia energia fratino, Francujo.

Tiu ĉi estis la unua okazo kiam mi estis devigata fari paroladon Esperantan, kaj mi timas, ke mi suferis je iom da timemo. Mi do estis feliĉa, kiam mi estis fininta la paroladeton de dankesprimio pro la granda afableco de niaj Parizaj Samideanoj, esperinte, ke ni en Londono baldaŭ povos montri al ili kelke da niaj vidindaĵoj.

Poste ni aŭskultis Esperantajn kantojn. La Gesinjoroj de Menil ambaŭ estas Esperantistoj,

The first object which catches the eye is a beautiful model of the world-famed canal. It must have been easier to scoop out the desert sand than to cut through the Panama rocks; nevertheless, the magnitude of the enterprise is very evident. We lunched together here, and the cuisine, like the building itself, was excellent.

Subsequently I called on M. Fruictier, the most busy Editor of *Lingvo Internacia* and of the new *Internacia Sciencia Revuo*. After a pleasant chat, we said *au revoir*, and I left to meet M. Bourlet, President of the Paris Group.

Of him, his devotion and indefatigability, I had of course heard much, and it was therefore a very great pleasure to become personally acquainted with this most kind comrade in our Cause. With him was his cousin, M. Mehrmann, Secretary of the Group in Château Thierry. It seems that all M. Bourlet's relatives have become Esperantists, except one, who is still busy studying English. This is very proper; but would it not be better to learn English from an Esperanto textbook?

We walked slowly towards the Palais Royal, chatting the while. Having arrived there, we entered the Restaurant Vefour, where I discovered a great feast had been made ready. There were more than twenty-five friends-in-Esperanto present, whose names I knew, but whom for the most part I had never seen.

I cannot here enumerate all those present: let it suffice to say that General Sébert (Member of the Institute of France), M. de Ménil (of Jarlibro fame), M. Rollet de l'Isle (who is occupied with the preparation of a Marine-Esperanto-Vocabulary), and almost every eminent Parisian Esperantist were present, except M. Cart and M. de Bréon, who were unfortunately prevented from participating.

During dinner, our friends sent most hearty greetings to all British Esperantists, and trusted that we will ever strive, together with our French brethren, to ensure the universal adoption of our dear Cause.

I, of course, replied to this kind message, and gave a short report of the present state of Esperanto here, and also said that we in England hope soon to reach the exalted station now held by our energetic sister, France.

This was the first occasion on which I had to make an Esperanto speech, and I fear I suffered somewhat from nervousness. I was accordingly glad when I had concluded the address with an expression of thanks for the great kindness of our Parisian fellow-thinkers, having hoped that we in London would soon have the opportunity of showing them some of our sights.

We then listened to some Esperanto songs. Both M. and Mme. de Ménil are Esperantists and

kaj muzikantoj, kaj verkis kelkajn tre melodiasajn kantojn. Ni ankaŭ kantis *La Vojo*, de M. Deshaya, kiu venis Londonon dum la pasinta jaro. Poste ĉiuj ĉeestantoj fotografiĝis per magnezia lumo, kaj, se la rezultato estos bona, ĝi eble enmetiĝos en **THE ESPERANTIST**.

Je la noktomezo mi eniris la Hotelon por dormi, kaj sonĝi, ke mi de plu estas nur H.B.M. sed ke mi fariĝis eminentulo ia, kiu faras plzurprogreson.

Je la sekvanta mateno, vekiginte, mi plezure vidis ke mia horloĝo montris nur la sepan kaj, sekve, ankoraŭ duonhoro da litkuŝado restis por mi. Estas terure, mi kredas, se oni devas elsalti en la malvarmecon, tuj post vekigo! Mi do trankvile kuŝadis, sed, subite, mi ektimiĝis! La horloĝo ankoraŭ montras la sepan! Ĉu la eminentulo estas enirinta belan landon, kie tempo ne estas? Mi aŭskultas: ne, la horloĝo haltis. Certe mi estas mankinta la vagonaron. Rapidege mi min vestas, kaj iras al la stacidomo. Gojo! Estas nur la oka, kaj estas sufiĉe da tempo.

Jam brilis la suno en sennuba ĉielo, kiam mi renkontis Sinjoron Bourlet, kaj eniris kune kun li, en trovarmigitan vagonaron. Kial la Francaj vagonaroj ĉiam estas tiel varmegaj? Mi preskaŭ ne povis spiri, kaj miaj piedoj estis preskaŭ rostitaj sur la fera supraĵo de la varmigilo.

Ĉirkaŭ la deknua, ni alvenis en Château Thierry, kaj denove renkontis Sinjoron Mehrmann, kiu kondukis nin ĉe Sinjoro Borson, la Prezidanto de la nova Grupo tie. Kun li estis rondeto Esperantista, kaj ni babiladis dum kelkaj minutoj. Mi tiam eltrovis, ke la ĉampana vino en ĉampanlando estas multe pli hongusta, laŭ mia opinio, ol tiu, kiun ni havas en Anglujo. Mi rakontis al la ĉeestantoj, ke mi biciklele vizitis, antaŭ unu jaro, la urbeton, kaj ke mi multe admiris la Urbestrejon, kie ni poste devis paroli. Kaj certe, se iu estis dirinta ke post malpli ol unu jaro mi enirus tiun Urbestrejon, per frako kaj fumpotĉapelo vestite, por paroladi iom pri Esperanto, mi ne estus povinta ĝin kredi. La vero estas ofte tre, tre stranga.

Ĉar la suno estis tiel brila, ni kune supreniris al la antikva kastelo, at, pli korekte, la kastelejo, de la Reĝo Theodoriko II., kiu donis sian nomon al la urbeto. La Esperanta Grupo nomas sin *Grupo Kastelteodorika*.

Je la tagmezo, ni malsupreniris de tiu ĉi aglonesto, kaj eniris la belan hejmon de Madame Mehrmann, kie ni tagmanĝis.

Tiu ĉi memorigas al mi, ke antaŭ enirinte Francujon, mi timis la Francan kuiradon: sed tute senkaŭze. Se nur niaj kamparaj gastejoj estus tiel komfortaj, kiel estas tiuj de niaj najbaroj, ni kredeble vidus pli da alilandaj turistoj.

musicians, and have composed several very melodious songs. We also sang *La Vojo*, by M. Deshaya, who visited London last year.

All present were then photographed by magnesium flash, and if the result be good, it may appear in **THE ESPERANTIST**.

At midnight I went to the Hotel to sleep, and to dream that no longer was I merely H.B.M., but that I had become some eminent person on a pleasure-progress!

Next morning I woke up and gladly saw that my watch only indicated seven o'clock, and that half-an-hour of bed still remained. It is terrible, methinks, to have to jump out into the cold at once on waking up! I was accordingly quietly resting when suddenly I had a fright. The hand still pointed to the seven! Has the eminent man entered a beautiful land where time is not? I listen: no, the watch has stopped! Certainly I must have lost the train. I dress post haste, and go to the station. Joy! It is only eight, and there is still time enough.

The sun was already shining in a cloudless sky when I met M. Bourlet, and went with him into an overheated train. Why are French trains so hot? I could scarcely breathe, and my feet were almost roasted on the iron plate of the warming apparatus.

About eleven o'clock we arrived at Château Thierry, and once more met M. Mehrmann, who took us to M. Borson, the President of the new Group there. With him was an Esperantist circle, and we chatted for some minutes. I then found that champagne in champagne-land is much more agreeable to the taste—in my opinion—than that which we have in England. I told those present that I had visited the town last year on a bicycle, and had much admired the Town Hall, where we had to speak later on. And, certainly, had anyone told me that in less than a year I should enter this Town Hall in a frock coat and silk hat to discuss Esperanto, I could not have believed it. Truth is often very, very strange.

As the sun was so bright, we clambered up to the ancient castle, or, more accurately, the castle site, of King Theodoric II., which gives its name to the little town.

The Esperantist Group is called the Group of *Kastelteodoriko*.

At midday we descended from this eyrie, and went to the charming home of Mme. Mehrmann, where we dined. This calls to mind that, before ever entering France, I dreaded the French cuisine; but quite without reason. If only our country inns were as comfortable as our neighbours', we should probably see more Continental tourists.

Dum tiu ĉi vojaĝo mi multe eksciis pri la ĉiutaga Franca vivado, kiu certe neniam estus lernita, se mi ne estis estinta Esperantisto, eĉ kun perfekta kono de la Franca lingvo; kaj mi denove devas danki la tre afablajn gesinjorojn, kiuj min tiel kore gastigis.

Post la tagmanĝo, Sinjorino de Ménéil ludis sian tre melodian Esperantan Valson. Ni poste procesiis tra la stratoj al la bela blanka Urbestrejo, kiu aliris tiom da mia atento la antaŭan jaron. Ni entiris belegan ĉambregon, pentritan kaj ornamitan, kie troviĝis granda Kastelteodorikanaro. La vetero estante tiel bela, ni timis, ke nur malmulte da personoj ĉeestus, sed ni eraris, kaj mi ĝojis vidi inter la kunvenintoj, multajn junulojn.

Ĝis nun preskaŭ ne estis okazo por memori, ke mi komprenis la Francan lingvon, ĉar, kompreneble, ni ĉiam interparoladis Esperante. Sed nun mi trovis, ke mi ne perdis mian tempon je la ellerno de tiu malfacila, sed bela, lingvo. Mi perfekte komprenis la rimarkindan paroladon, kiun faris Sinjoro Bourlet. Sed ĉiuj bonaĵoj finiĝas, kaj mi multe bedaŭris, ke mi povis kompreni la Francan, kiam, paroladmeze, mia amiko deziris, ke mi diru iom *en la Franca* por montri, ke estas preskaŭ neeble, ke alilandulo perfekte lernu lingvon tiel malfacila kaj neregula. Vere miaj aŭdantoj estis tre paciencaj, kaj ne multe ridis je mia penado, sed mi multe ĝojis, kiam oni lasis min denove paroladi Esperante! Ĉu tiu ĉi provo varbigis kelkajn el la ĉeestantoj?

Je la kvina horo la kunveno finiĝis, kaj ni faris unu aŭ du vizitetojn antaŭ ol ni reeniris la hejmon de la gastama Sekretario.

Dum mia antaŭa mallonga ĉeestado en Château Thierry, mi perfekte konatiĝis kun la naturaj belaĵoj de la regiono, sed nun, dank' al Esperanto, mi konas iom pri la tieaj loĝantoj, kaj iliaj belaj hejmoj.

Rapide, tro, tro rapide, alvenis la forirtempo, kaj la varmega vagonaro nin reportis Parizen.

Kompreneble la kunvojaĝantoj multe interesigis, atŝkultante nian Esperantan interparoladon. Ĉu ili kredis ke ni ne estis samlanduloj?

Je la dekunua (nokte) mi devis diri adiaŭ al mia tre sindonema nova amiko, kaj mi tramis al Gare de Lyon, kie la stacidomo estis gajigita de ĉiaspecaj soldatoj.

La vagonaro forveturis je la unua horo. Mia sola kunvojaĝanto estis oficiro iranta al Tonkino. Ni kunparoladis iom, pri Esperanto inter aliaj

Throughout this journey I learnt a great deal about French every-day life, which certainly would never have been acquired had I not been an Esperantist, even with a perfect knowledge of French; and I have once again to thank the most kind ladies and gentlemen who so cordially extended me their hospitality.

After dinner, Mme. de Ménéil played her very melodious Esperanto Waltz.\*

We then proceeded through the streets to the beautiful white Town Hall, which had attracted so much of my attention the year before.

We entered a very fine painted and ornamented hall, in which was assembled a number of the townsmen.

As the weather was so lovely, we feared that but few would be present, but we were mistaken, and I was glad to see among the audience many young people.

Until now there had hardly been occasion to remember that I understood French, for, naturally, we always conversed in Esperanto. But I now found that I had not wasted my time in the study of this difficult, but beautiful, tongue. I perfectly understood the remarkable lecture which M. Bourlet gave. But all good things come to an end, and I much regretted my ability to understand French when, in the middle of his discourse, my friend wanted me to say something *in French* to show that it is almost impossible for a foreigner to learn such a difficult and irregular language perfectly! My audience was truly very patient, and did not laugh very much at my pains, but I was exceedingly glad when I could once more be permitted to speak in Esperanto! Did this test gain over any of those present to our Cause?

At five o'clock the meeting ended, and we paid one or two calls before returning to the hospitable Secretary's home.

On my previous visit to Château Thierry I had become well acquainted with the natural beauties of the locality, but now, thanks to Esperanto, I know something of the inhabitants and their beautiful homes.

Swiftly, too, too swiftly, came the hour of departure, and the hot train took us back to Paris. Naturally the fellow-travellers were much interested in listening to our Esperanto conversation. Did they imagine that we were not of the same nationality?

At eleven p.m. I had to say good-bye to my most kind friend, and took the tram to the Gare de Lyon, where the station was made gay by soldiers of all kinds.

The train left at one in the morning. My sole companion was an officer going to Tonquin. We talked a little about Esperanto among other

\* This can now be obtained from the Librarian, price 6d., post free.

temoj, kaj li diris, ke eble li lernus la lingvon vaporsipe, anstataŭ ĉiam kartludadi.

Tiam, ĉar la vagono ne estis tro varma, mi metis sur min kovrilon, kaj bone dormis.

La dekunuan de la 14a Marto mi alvenis Dijonon, kaj, dank' al la verda stelo en la buton-truo, mi estis rekonita sur la strato de Sinjoro Jullien, la Sekretario de la Grupo. Li kondukis min en Bufedon, kie kelkaj konataj Esperantistoj kunveniĝis, kaj kie ni tagmanĝis. Sinjoroj Boirac (Rektoro de la Universitato), Lambert (Profesoro ĉe la Universitato), Lallemand (Kunverkanto de *Diversaĵoj*), Sinjorino Bastoul (Vicprezidantino de la Grupo), kaj multaj aliaj ĉeestis.

Dum la manĝado, Sinjoro Boirac klarigis al mi la proponon pri la venonta Libertempa Kurso ĉe la Dijona Universitato, pri kiu mi aliloke skribos. Kompreneble tiu ĉi devas multe helpi nian aferon, se diverslandanoj povos tie renkontiĝi.

Poste Sinjoro Jullien afable kondukis min en la antikvan palacon de la Burgundaj Duko, kaj en la muzeon, kie troviĝas la famegajn Flamandajn skulptaĵojn. Sed tiuj ĉi ankaŭ ekzistas por ĉiuj, kaj mi devas nun konduki miajn legantojn en la domon de Sinjorino Bastoul, kie ili aŭdos min, en fonografon parolante, donante koregan danke-sprimon al la tieaj samideanoj pro ilia tre kora akcepto, kaj esprimante la esperon ke ni havu tian kunvenon en Londono.

Mi ankaŭ vizitis la grandegan biskvitfarejon *Pernot*, kaj multe interesigis. Vere la pureco kaj praktikeco tie estas tre rimarkindaj.

Enirinte la Hotelon de la Cloche (Sonorilo), kie la Grupo kaj la Angla Klubo kunvenadas, mi vespermanĝis, kaj havis mallongan minuton por skribi raporteton Londono pri mia vojaĝo, kaj poste rapidis al la Universitato, por ĉeesti ĉe la Grupkunveno. Mia alveno estis anoncita en la lokaj ĵurnaloj, kaj la ĉambrego estis tute plenigita por aŭdi Anglan Esperantiston.

Sinjoro Lambert klarigis kelkajn punktojn pri la Esperanta Gramatiketo laŭkutime, kaj poste mi alparolis la ĉeestantojn en Esperanto, dirante ke ni en Londono kun granda intereso rimarkas la antaŭmecon de Dijono. Cetero, mi legis sciigeton de nia agema Malta apoganto, Doktoro Busuttil, kiu elmontris, ke Anglujo ne estas la sola lando, kie oni rimarkas tiun ĉi.

La kunveno finiĝinte, ni kune eniris kafejon antaŭ ol reveni al la Hotelo, tie pasigi la nokton, se oni povas nomi nokto la tempon de noktomezo ĝis la kvina kaj duono, je kia horo vagonaro ekforiras Lionon.

La Grupo de Beaune afable invitis min ĉeesti ĝia kunveno je la sekvanta tago, sed mi devis malakcepti, ĉar oni atendis min Liono tagmeze.

subjects, and he said he would probably learn the language in the steamer, instead of always playing cards.

Then, as the compartment was not too hot, I covered myself with a rug, and slept soundly.

At eleven o'clock, on March 14, I arrived at Dijon, and, thanks to the green star in my button-hole, was recognised in the street by M. Jullien, the Secretary of the Group. He took me into the Buffet, where several well-known Esperantists had assembled, and where we had lunch. Mm. Boirac (Rector of the University), Lambert (Professor at the University), Lallemand (Collaborator of *Diversaĵoj*), Mme. Bastoul (Vice-President of the Group), and many others were present.

During the meal M. Boirac explained the proposal re the coming Dijon University Holiday Course, of which I will treat elsewhere. Obviously this must greatly help our Cause, if Esperantists from various countries can meet there.

Then M. Jullien kindly took me over the ancient palace of the Dukes of Burgundy, and into the museum, where are the renowned Flemish sculptures. But these also exist for all, and I must at once take my readers to Mme. Bastoul's home, where they will hear me speaking in a phonograph, recording my hearty thanks for their kind welcome, and expressing the hope for a similar meeting in London.

I also was taken over the great biscuit factory Pernot, and was much interested. Truly the cleanliness and practicality there are most remarkable.

Having gone to the Hotel de la Cloche, where the Group and the English Club hold meetings, I dined, and had a little minute in which to write a short report home, and then I hastened off to the University, to be present at the Meeting of the Group. My arrival had been announced in the local papers, and the Hall was quite full to hear an English Esperantist.

M. Lambert gave the customary explanation of some Grammatical points, and I then addressed the audience in Esperanto, saying that we in London remark with great interest the go-ahead characteristics of Dijon, and I also read a note from our busy Maltese supporter, Dr. Busuttil, which proved that England was not the only land to observe their progress.

The meeting over, we went together to a café before returning to the Hotel, to pass the night—if one can call night the time from midnight to 5.30, when the train leaves for Lyons.

The Group in Beaune had kindly asked me to be present at its gathering on the following day, but I had to refuse, being expected in Lyons at

Tamen mi promesis viziti Beaune je mia reveno, Marto 25.

Vere Dijono enhavas multe da Samideanoj, unu el kiuj rekonis min matene en la stacidomo, kaj vojaĝadis kun mi.

Marto 15 ankaŭ estis belega tago, suno kaj blua ĉielo ĉie. Alveninte la grandegan kaj belegan Lionon, mi sekvis la konsilojn de la sindonema Profesoro Offret, kaj ni renkontiĝis por tagmanĝo kune kun Doktoro Dor, kaj aliaj Komitanoj de la Grupo.

La legantoj memoros, ke estis Sinjoro Offret, kiu ĵus eldonigis la raporton pri la *nuna stato de Esperanto en la mondo*, kaj mi havis la privilegion vidi la respondojn, kiujn li ricevis. Vere la Liona Grupo estas tre feliĉa, je la posedo de tia Sekretario; kaj, kiam mi rimarkis la bonordigadon de ĉiuj la Grupaj aferoj, mi tuj deziris ekŝiĝi la Sekretariecon de la Londona Klubo, por ke in havanta pli da tempo povu pli energie klopodi pri la afero.

Liono estas vasta kaj belega urbo, kaj vere la samideanoj ne permesis, ke mi foriru antaŭ ol mi estis vidinta la ĉefajn vidindaĵojn, pro kiu mi ilin korege dankas. Sed tie ĉi ankaŭ la Silka Muzeo; la Pentraĵaroj; la mirinda vidaĵo de la Negaj Alpoj; la bela Parko; la kunfluo de la du riveroj, la Saône kaj la Rhône; ekzistas por ĉiuj vizitantoj, ne sole por Esperantistoj. Mi do nur priskribos la plezuron kunvenon vespere, post ke ni estis kunvespermanĝintaj. Ĉe tiu ĉi kunveno, mi parolis en Esperanto, de mia tuta libertempo. Kaj, vere, mi tiom da interesaĵoj kaj memorindaĵoj estis vidinta, ke la tagoj ŝajnis esti semajnoj!

Sed nun, bedaŭrinde, tiu ĉi Esperanta vojaĝo preskaŭ finiĝis. Mi estas serĉonta kvieton kaj sanon je la belaj Italaj Malalpoj. Mi do foriris de Liono noktomeze, kaj vekigis apud St. Raphael, kie oni unue vidas la belan, bluegan Mediteranean Maron.

#### Marto 16—27.

Vere estas felando, tiu ĉi mirinda regiono. Palmoj, oranĝoj, belaj vojoj por la biciklo, ĉiaspecaj kaj ĉiakoloraj floroj, kaj miloj da tiaj belaĵoj. Kaj, super ĉiu, la ĉiam brila suno, la helega aero. Vere, kiam oni trovas tian pejzaĝon en Marto, oni ne povas eviti pripensi Londonon. Tamen mi amas Londonon, eĉ kun ĝia nigreta kaj ofte iom malgaja vidigo!

Pri la belaĵoj de felando mi ne tie ĉi devas skribi, sed mi neniam povos sufiĉe danki Esperanton, kaj la Esperantistojn, por ke ili ebligis al mi tian vojaĝon. Sinjoro Bicknell, kiu gastigis min, kaj kies nomo estas tiel bone konata de la legantoj de THE ESPERANTIST, estas tiel afabla, kiel liaj

mid-day. I however promised to visit Beaune on the return journey, March 25.

Assuredly Dijon boasts of many Esperantists, one of whom recognised me at the station in the morning, and travelled with me.

March 15 was also a lovely day, sunshine and blue sky everywhere. Having reached the vast and beautiful Lyons, I followed the directions of the kind M. Offret, and we met for lunch with Dr. Dor and some other Committee Members of the Group.

Readers will recollect that it is M. Offret who has just published the report on the *Present State of Esperanto in the World*, and I had the privilege of seeing the replies which he received. Truly the Lyons Group is fortunate in possessing such a Secretary; and when I saw the very neat ordering of all the Group's affairs, I at once wished to resign the Secretaryship of the London Club, so that someone with more time and ability could pay more energetic attention to the matter.

Lyons is a very vast and beautiful city, and friends would not let me depart before seeing its principal sights, for which I owe them hearty thanks. But here also the Silk Museum, Collections of Paintings, the wonderful view of the Snowy Alps, the fine Park, the confluence of the two mighty rivers, Saône and Rhône, are for all visitors, not for Esperantists alone; so I will only mention the agreeable evening meeting, after we had dined together. Here I spoke in Esperanto of the whole trip. And, really, I had seen so many interesting and memorable things that days seemed weeks!

But now, unfortunately, this Esperanto-holiday had almost come to an end. I was about to seek quiet and health in the lovely Maritime Alps of Italy. I therefore left Lyons at midnight, and woke up near St. Raphael, where one first catches sight of the beautiful, intensely blue, Mediterranean.

#### March 16—27, 1904.

It really is a fairyland, this wonderful region. Palm trees, oranges, good cycling roads, flowers of all kinds and colours, and thousands of similar lovelinesses. And over all the ever-burning sun, the air most clear. Finding such a landscape in March, one cannot help thinking of London. Nevertheless, I love London, even with its blackish, and frequently somewhat dreary, aspect!

I cannot write of the wonders of this fairyland, but I can never adequately thank Esperanto and the Esperantists for making such a journey possible. Mr. Bicknell, whose guest I was, and whose name is so well known to the readers of THE ESPERANTIST, is as kind as his writings are

skribaĵoj estas interesplenaj. Mi multe ĝuis oftajn ekzkursojn kun li en la montaron, aŭ promenante, aŭ biciklante.

Ĉiam, kiam oni estas feliĉega, la tempo ŝajne flugas je ventoflugiloj, kaj estis tre malĝoja, kiam la fino de la libertempo proksimiĝis, kaj estis necese reeniri la varmegajn vagonarojn.

Mi vizitis la palm-kaj oroplenan Monte Carlo, kie oni ne bezonas esti alkemiisto por ŝanĝi arĝenton en oro (aŭ oron en nenio). Tiu ĉi loko ŝajnis esti la plej bela el ĉiuj. Tamen, je mia alveno tie, la ĥajlo kaj neĝo falegis, kaj ĉiuj la belaj parkfloroj estis per kovriloj ŝirmitaj. Tiu ĉi estis la sola sensuna tago!

Mi ankaŭ vizitetis Nice kaj vidis Sinjoro de Villemain, la Sekretario de la Grupo.

En Nice ankaŭ mi perdis mian poŝlibreton, enhavantan belan poemon kaj multe da sciigoj por la Gazeto!

Je la 25 Marto, antaŭ la tagmezo, mi alvenis en Beaune (Cote d'Or, ne Alĝerujo, kie la fervojistoj deziris min sendi). Sur la promenejo de la stacidomo troviĝis la verda stelo, kaj mi konatiĝis kun Sinjoro Cyrot, Sekretario de la Grupo. Ni kunforiris, kaj tagmanĝis kun la komitatano, kaj mi denove ĝuis la gastamon de la Esperantistoj.

Poste ni vizitis la rimarkindan *Hostel Dieu*, kaj ĝian mirindan pentraĵon de la Fina Juĝo; ni rampis en la Sonorilejon (Beffroi) eniris la Parkon kaj eksciis iom pri *truloj*, *kiuj manĝas cignojn*!

Je vespermango, tre ŝerca okazo multe ridigis nin. Ni kunparoladis en la Hotelo ĉiam en Esperanto, sed, subite, oni diris frazon, kiun mi tute ne povis kompreni. Eĉ je la dua fojo la afero estis nekomprenebla. Fine mi lernis ke la nekonataj vortoj estis en la Angla lingvo! Jen interesa fakto por tiuj, kiuj kredas, ke la malfacila Angla lingvo devas esti uzata por ŝlosillingvo.

Post vespermango ni kuniris al la Liceo, kie Sinjoro Mathouillet faras Esperantan kurson, kaj mi renkontis alian aron da samideanoj. Beaune estas centro de la vinkomercio de Francujo, kaj M. Deschamps, komitatano de la Grupo, elpensis novan sistemon por figuri per la botelo, la participojn Esperantajn. Sur paperego, oni vidas tri virojn, la unua tenas en mano botelon da Beauna vino. Li estas *trinkonta*, kaj la vino estas *trinkota*. La dua viro jam suprenigis la botelon al la buŝo, kaj estas *trinkanta*, kaj la vino estas *trinkata*. Sed la tria viro, kun tre gaja mieno, multe dancadas, malplena botelo en mano. Li estas *drinkinta*, kaj la vino ne plu estas, ĝi estas *trinkita*!

interesting. I greatly enjoyed frequent excursions, either on foot or bicycle, with him into the mountains.

Always, when one is very happy, time seemingly flies on the wings of the wind, and it was very doleful when the end of the visit approached, and I had once more to go into the stuffy trains.

I visited the palmy and golden Monte Carlo, where one need not be an alchemist to convert silver into gold (or gold into nothing). This spot seemed the most lovely of all. Yet on my arrival there the hail and snow fell heavily, and all the lovely flowers in the parks were protected by coverings. This was the only day that was overcast.

I also paid a short visit to Nice, and saw M. de Villemain, the Secretary of the Group.

In Nice, also, I lost my pocket-book, containing a beautiful poem and many notes for this Gazette!

On March 25, before mid-day, I reached Beaune (Côte d'Or, not Algeria, whither the porters tried to send me). On the station platform the green star was in evidence, and I made the acquaintance of M. Cyrot, the Secretary of the Group. We went out together, and lunched with the Committee; once again I enjoyed the hospitality of Esperantists.

Later we visited the remarkable *Hostel Dieu* and its wonderful painting of the Last Judgment, we scrambled up into the Belfry, and went into the Park, and learned something of *trout which eat swans*!

At dinner a very amusing occurrence caused much laughter. In the Hotel we always spoke Esperanto, but suddenly someone said a phrase I could not understand. Even the second time it was incomprehensible. Finally, I learned that the unrecognised words had been said in English! Here is an interesting fact for those who think that the difficult English language must be used for a key language.

After dinner we went off together to the Lycée, where M. Mathouillet holds an Esperanto course, and I met yet a further group of Esperantists. Beaune is a centre of the wine trade in France, and M. Deschamps, a committee member of the Group, has thought out a new way of illustrating the Esperanto participles with the help of the bottle. On a large sheet of paper are depicted three men, the first holding in his hand a bottle of Beaune wine. He is *about to drink*, and the wine is *about to be drunk*. The second individual has raised the bottle to his mouth. He is *drinking*, and the liquor is *being drunk*. But the third man, with very gay physiognomy, is dancing with an empty bottle in his hand. He *has drunk*, and the wine *has been drunk*!

Sed la Grupo ankaŭ posedas indan poeton, kaj espereble legantoj de THE ESPERANTIST povos parkere lerni kelkajn Beaunajn poemojn, sendube inspiritajn de la Beuna vino.

Noktomeze mi adiaŭdiris, kaj eniris la vagonaron kaj alvenis en Parizo matenfrue de la 26 de Marto. Ne plu Esperantante, mi pasigis la tagon en la Palaco de la Louvre, kaj en la Jardin des Plantes. Poste, tre laciga, mi aĉetis Anglan Gazeton, por vidi ĉu ĝi estas ankoraŭ en Esperanto presata; kaj, vidante, ke ne eĉ estas *kolono* Esperanta tie, mi rapidis al Londono por demandi la kaŭzon.

En la vagonaro mi varbis unu aliĝonton, sur la vaporŝipo alian.

Alveninte en Londono, mi trovas, ke la vetero ankoraŭ estas tre malvarma. Oni tremetas, kaj pensas pri la Itala varmeco, kio oni preskaŭ deziras skvi la ekzemplon de niaj unuaj gepatroj pri la vestaj aferoj.

#### *Kaj poste.*

Vere, kiam la Esperanta movado en Anglujo ĝajnis tiom da profesoroj, Doktoroj, kaj eminentuloj, kiom ĝi nun havas en Francujo, la lingvo estos venkinta! Ĝis nun, bedaŭrinde, nur malmulte da instruistoj kaj scionculoj interesiĝis je la afero. Sed sendube tiu ĉi baldaŭ venos, kaj tiam ni, kune kun niaj simpatiaj Francaj amikoj, povos vidi la belegan rezultaton de niaj sencesaĵ klopodoj—la alprenon de Esperanto tutmonde.

Ju pli oni esploras la Esperantistaron, des pli oni konvinkigas je la granda estonteco de la lingvo. Ĉie Esperantistoj kunpensas pri ĝia praktikeco kaj netuŝebleco. *Ĉie ni estas veraj Samideanoj!*

*Ĝis la Revido! Ĝis la Revido!*

H. BOLINGBROKE MUDIE.

But the Group also possesses a worthy poet, and it is to be hoped that readers of THE ESPERANTIST will be able to learn by heart some *bonaj* poems, doubtless inspired by the *bona* wine.

At midnight I said good-bye, went into the train, and arrived in Paris early in the morning of the 26th. No longer Esperanting, I spent the day at the Louvre and the Jardin des Plantes. Then, very very tired, I got an English paper to see if it were yet printed in Esperanto; and, seeing not even an Esperanto *column* there, I hastened to London to ask the reason.

In the train I made one convert; in the steamer another.

Arrived in London, I find the weather is still cold. One shivers, and thinks of the warmth of Italy, where one is almost desirous of following the example of our first parents as regards the clothing problem.

#### *And Afterwards.*

Assuredly, when the Esperanto movement in England has gained as many professors, doctors and eminent men as it now has in France, the language will have won the day. Up to the present, unfortunately, but few teachers and scientific men here have become interested. But, without doubt, this will soon come, and we, with our cordial French friends, shall be able to see the grand result of our ceaseless labours—the adoption of Esperanto universally.

The more one sees of the Esperantists, the more one is convinced of the language's great future. Everywhere Esperantists are agreed as to its practicality and unalterableness. *Everywhere we are true fellow-thinkers!*

*Au Revoir! Au Revoir!*

LITERAL TRANSLATION.

### A PROGRESSIVE LIMERICK.

Clarence Bicknell.

Fraŭlin' ridetanta de Nigro,  
Sursaltis por rajdi sur tigro.  
La rajdo finiĝis, sed ŝi interniĝis,  
Pro kiu ridetis la tigro.

Deziris ridanta fraŭlino  
Rajdadon sur dors' de tigrino;  
Sed ŝi revenante interne rajdante  
Ne plu ridis, sed la tigrino.

Per salto sidiĝis sur tigro  
Ridanta fraŭlino de Nigro.  
Internen li metis ŝin, kiun ne petis ŝi—  
Tiam ridetis la tigro.

Fraŭlin', kiu loĝis en Nigro,  
Ridante ekrajdis sur tigro  
La rajd' ne plu estis, interne ŝi restis  
Kiam ridegis la tigro.

Fraŭlino eliris de Nigro  
Ridete rajdante sur tigro.  
Ho, kia vidaĵo! Ŝi tuj internaĵo  
Ridetis ne plu, nur la tigro.

Fraŭlin' iafoje de Nigro,  
Ridetis saltante sur tigro;  
La rajdo finiĝis ĉar ŝi interniĝis  
Sed gaje ridetis la tigro.

Etc., Etc., Etc.



[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 0206.]

(Vidu la ses antaŭajn Nrojn.)

## AKTO I.

## SCENO 2 (daŭrigo).

- Mi ĉion montris! . . . Ke la sorĉartiloj  
De Sikorakso, buĝ', skarab', vesperto . . .  
Sur vin tuj falu!—Estas mi subulo!  
Mi tiam sola mia propra reĝo!  
Min porke nun vi tenas en ŝtonego,  
Dum la ceterajn partojn vi posedas!
- PROSPERO.**—Mensoga sklavo, kiun bonaj agoj  
Neniam povis tuŝi, sed nur skurĝo!  
Ŝlimido, mi unue kun vi agis  
Zorgeme, home, eĉ mi vin lokadis  
En groto mia . . . ĝis vi idon mian  
Atencis malvirgigi. . . .
- KALIBANO.**— Vi malhelpis.  
Se rajte estus ĝi de mi farita,  
L'insulo estus Kalibanigita!
- PROSPERO.**—Ho, sklavo abomena, ne ameco  
Kortuŝos vian malbonecon bestan;  
Nur povas vi plenumi bestan rolon.  
Kompate, mi paroli vin instruis,  
Novaĵon taŭgan montris tage, hore;  
Bestulon, kiu tiam sole blekis  
Simile al la bruto, mi instruis  
Paroli home, kaj objektojn nomi.  
Sed, parolante, via bruta raso  
Enhavas tion, kio ne permesas  
Honeste agi: tial en ŝtonego  
Malliberulo vi de tiam restas,  
Anstataŭ pli malbona sorto.
- KALIBANO.**— Vere  
Paroli vi min faris: la profito  
Jen estas: mi nun povas vin malbeni.  
Erisipelo ambaŭ vin mortigu!  
Mi lernis tion el la lingvo via.
- PROSPERO.**—Sorĉido! for de tie ĉi! rapidu!  
Hejtaĵon tuj alportu, mi konsilas;  
Plimulte poste, sed nun tion faru!  
Ĉu ŝanceliĝos vi, ĉu malobeos,  
Mi tiam streĉos la muskolojn viajn,  
Kaj ostojn dolorigos: vi blekegos . . .  
La bestojn timigante.
- KALIBANO.**— Ne, mi petas.  
(*Flanken*) Obei li magie min devigas.  
Potenco tia ke l'patrina dio  
Setebos estus ĝia sklavo!
- PROSPERO.**— Iru! (*Foriras Kalibano*)
- Revenas ARIELO nevidebla, ludante kaj kantante;  
sekvas FERDINANDO.*

## KANTO DE ARIELO.

*Sur la flavan sablon venu,  
Manojn interpretu;  
Salutintaj, eĉ kisintaj,—  
(Paca mar' sin tenu!)—  
Tie ĉi kaj tie saltu,  
Koboldeme: nun, ni haltu.  
Aŭskultu!*

Rekantaĵo (malproksime): *Boju, hundoj, boju!*  
*Hundoj, boju, boju!*

Rekantaĵo: *Boju, hundoj, boju!*  
*Aŭdu nun la kokan krion;  
Ĉantikliron\* kantas tion:  
"Kokoraŭko!" krias koko.*

**FERDINANDO.**—El kie venis tia stranga kanto?  
El aer' aŭ el tero? . . . Plu ne sonas . . .  
Ĉu estas io de insula dio?  
Mi sidis ploreanta pri la sorto  
De mia patro kiu ĵus pereis . . .  
Dolĉegaj sonoj venis super l'ondo,  
Ĝin kvietigis,—eĉ doloron mian;  
Altiris min ĉi tien l'harmonio,  
Sed ĵus forĉesis. . . . Ne! ĝi reko-  
mencas. . . .

## ARIELO KANTAS:

*Sub tridek futoj da marakvo  
Profunde patro restas;  
Fariĝas ostoj nun koralo;  
Okuloj pertoj estas:  
Aliformiĝas li marame,  
Tre riĉe kaj orname,  
Hore mortsonoro tintas,  
Maraj nimfoj kantas:*

Sonorila eĥo: *Bum! bom! bam! bum!*  
*Ĉin aŭdas mi, . . . Aŭskultu!*

Ĥora eĥo: *Bum! bam! bom! bum!*

**FERDINANDO.**—Ĝi diris pri droninta patro mia!  
Ne estas terdevena homa kanto  
Aŭdita de mi supre!

**PROSPERO.**— Ho, Mirando,  
Palpebroj viaj malfermiĝu: kion  
Ekvidas vi antaŭe?

**MIRANDO.**— Kio estas?  
Spirit' ? Ĉielo! Kiel ĝi rigardas!  
Sinjoro, certe ŝajnas ĝi belforma;  
Spirito tamen estas.

(Daŭrigota).

\* Angle, chanticleer.

## LA SIMIO.

Fablo 18 el Fénélon, Tradukita de Maurice Mehrmann.

De maljuna ruza simio, la ombro malsupreniris post morto, en la malhelan loĝejon de Plutono, kie ĝi petis por reveni inter la vivantoj.

Plutono volis resendi ĝin en la korpon de multopeza kaj malsprita azeno, por senigi ĝin de ĝia flaksebleco, viveco kaj ruzeco; sed ĝi faris tiom da ŝercoj kaj petoladoj, ke la nepardonema Reĝo de la Inferoj ne povis sin deteni de ridado, kaj permesis al ĝi elekti novan iston.

La simio petis por eniri korpon de papago. "Tiel, almenaŭ," ĝi diris, "mi konservos ian similecon al la homoj, kiujn mi longatempe imitadis. Estinta simio, mi faris gestojn kiel ili, kaj estonta papago, mi alparolos ilin dum la plejagrablaj interparoladoj."

La animo de la simio eniĝis apenaŭ en tiu nova stato, kiam maljuna babilema virino ĝin aĉetis. Ĝi ĝojigis ŝin; kaj ŝi metis ĝin el belan kaĝon. Ĝi bone mangadis kaj kunbabiladis, la tutan tagon, kun la maljuna babilemulino, kiu senĉese paroladis kiel ĝi. El sia antaŭa stato ĝi aldonis ion nekonatan al siaj novaj talentoj: ĝi ridinde movis sian kapon, krakigisian bekon, agitis centmaniere siajn flugilojn kaj per siaj piedetoj faris multajn sensensaĵojn, kiuj rememorigis pri la grimacoj de Fagotino.

Ĉiumomente la maljunulino surmetis siajn okulvitrojn por ĝin admirari. Ŝi enuis tial ke ŝi estis iom surda, kaj ne aŭdis kelkfoje parolojn de sia papago, kiun ŝi trovis pli sprita ol iu ajn. La papago trezorgita fariĝis babilegema, trudema, frenezega.

Ĝi tiom ekscitiĝis kaj trinkis tiom da vino kun la maljunulino, ke ĝi mortis.

Denove ĝi revenis antaŭ Plutono, kiu, tiun fojon, volis ĝin transigi en fiŝan korpon por ĝin mutigi; sed refoje ĝi petoladis antaŭ la Reĝo de Ombroj, kaj la princoj malofte rifuzas la petojn de la ŝercemuloj, kiuj ilin flatas. Plutono do permesis al tiu ĉi eniri homan korpon. Sed, ĉar Dio hontis sendi ĝin en korpon de saĝa kaj virta homo, li ĝin aligis al korpo de enuiga kaj trudema paroladisto, kiu mensogis, kiu senĉese fanfaronadis, kiu faris ridindajn gestojn, kiu mokis ĉiujn ajn, kiu interrompis la plej klerajn kaj seriozajn paroladojn per neniaĵoj aŭ malĝentilaj malsaĝaĵoj. Merkuro, kiu ĝin rekonis en tiu nova stato, ridante diris: "Ho! Ho! mi vin rekonas, vi estas kunmetitaĵo el simio kaj papago, kiujn mi iam vidis. Kiu deprenus de vi la gestojn kaj parolojn, senpripense ellernitajn, tiu al vi nenion lasus. Per beleta simio kaj bonega papago, oni nur faris malsaĝan homon."

*Kiom da homoj en la mondo, per kunvenaj gestoj, babileto kaj ŝajna kapableco, estas nur senspruituloj kaj senkleruloj!*

## INSTINKTO AU INTELIGENTECO?

Originale verkita de O.W., Esperantisto 7074 (el Francujo).

Oni ofte parolas pri la instinkto de iaj bestoj, precipe de la hundoj. Oni rakontas pri ili historiojn, kiuj kredigus pli al ilia inteligenteco ol al ilia instinkto. Mi volas rakonti al vi nur anekdoton, kiun mi certigas al vi tute vera.

Kiam mi komencis ekzerci la medicinon, mi loĝis en urbeto proksima de bela rivero. Unu el miaj parencoj tie posedis akvomuelejon, kaj mi tre ŝatis la banojn en rivero. Ofte, kun miaj amikoj, ni trairis la riveron per barko por bani je la alia flanko de la digo, kie estas profunda kaj tre agrabla loko, ombrigita de multaj kaj altaj arboj. La bruado de la akvo, kiu faladis de la kluzo, ĉarmis nin, kaj donis al ni akvon ĉiam movan.

En tiu tempo mi havis belan ĉashundinon grifon-rasan, kun la haraj rigidaj. Ĝi estis bona, amema besto, tute sindona por sia mastro. Ĝi neniam lasis min. Nokte kaj tage ĝi estus difendinta min kontraŭ kiu ajn, kaj malgraŭ tio, ĝi estis karesema.

Ian tagon, k' am mi banis min kune kun amikoj, mi diris al unu el ili, kiu estis apud mi: "Mi ŝajngos droni por vidi kion faros la hundino."

En tiu momento ĝi estis dekkvinjara, kaj ne tre ŝatis la akvon. Mi puŝis ekkrion, alvokante: "Dian! Dian!" ŝatmigante la akvon ĉirkaŭ mi.

Tuj ekjetigis la hundino en la akvon, kaj rapide alnaĝis al mi. Ĝi per siaj dentoj ekkaptis sendolore mian ŝultron por alkonduki min teren; sed mi prenis la voston de Dian' dirante al ĝi: "Iru, Dian'! Iru!" kaj la hundino rapidis por atingi la bordon.

Mi suprenrampis la deklivon, kaj mi alvenis sur la herbejon. Tio Dian' elmontris ĝojegon blekante pro plezuro, saltante por leki miajn manojn, kaj mian vizaĵon. Tio certe ne estis miriga; multe da hundoj estus same agintaj, propramove, *instinkte*, se vi volos. Sed la historio ne estas finita.

Post kelkaj tagoj, ni decidis ankoraŭ, ke ni banus nin. Mi do aliris ĉe mian parencon por preni la barkon. Mi pretiĝis por senkatenigi la barkon, kaj por ĝin eniri, kiam mi sentis, ke io malebligis min; ĝi estis mia hundino kiu, per siaj dentoj, tenis mian pantolonon: Dian' ne volis ke mi eniru la barkon. Tre malfacile mi sukcesis por enirigi ĝin kaj ni deiris. Ni alboridiĝis al la elektita kaj kutimita loko. Miaj amikoj senvestiĝis, kaj mi lasis mian jakon, sed, kiam mi volis daŭrigi, mi ne povis.

Dian' blekis furioze kontraŭ mi, montrante al mi siajn dentojn. Mi provis kvietigi ĝin, sed vane; mi estis devigita revestigi min. Dian' ne volis, ke mi banu min. Ĉu tio estas *instinkta* aŭ *inteligenta*?

Mi lasos vin respondi tiun demandon, sed de longe mia opinio estas difinita.

## RUBAJATO DE OMARO KAJAMO.

Tradukita de Ben Elmy.

- 1 Vekiĝu ! Jen, la suno jam forpelas  
Stelojn kaj nokton ; el ĉiel' akcelas  
Radi' unua, kaj per sia brilo,  
La turo de l'Sultano alte helas.
- 2 Dum el mallum' kreskadis taga pleno,  
Audiĝis voĉ', plendante pri deteno,—  
"Dormulo, kial vi ekstere restas ?  
En templo jam atendas la festeno !"
- 3 La kok' ekkrias ; ĉiuj en akordo,  
Ekpetas, "Malfermata estu pordo !  
Ni povas resti iom nur da tempo,  
Nek plu vidigos ĉe la tera bordo !"
- 4 Printempo, la naskiĝo de novjaro !  
Revivas nun la juna deziraro ;  
Sed homo pensa pace nun foriĝas,  
Ce freŝaj blankaj floroj de l'kamparo.
- 5 Iram' pereis, vere, kun jasmeno,  
Sed restas lag' alia, kaj ĝardeno ;  
Se vazon de Jamŝid' ne plu ni vidas,  
En vino brilas ĉiam la rubeno.
- 6 David' silentis ; sed, per voĉo klara,  
Al rozo pepas najtingalo kara,—  
"Vin' vin' vin' vino, ruĝa ruĝa vino !"  
Kaj roz' ruĝiĝas, en respond' neŝpara.
- 7 Plenigu vazon ; ĉe printempa festo,  
Bruliĝu ĝoje vintra pentovesto ;  
Mallongan vojon havas tempobirdo  
Por flugi, kaj rapidas al la nesto.
- 8 Ĉe urbaj au ĉe kampaj societoj,  
La vin' de vivo falas per gutetoj ;  
Simile, kvazau floro kadukanta,  
De vivo falas vice folietoj.
- 9 Mil rozoj, oni diras, venos morgaŭ ;  
Sed kien iris rozoj de hieraŭ ?  
Monato sama, rozojn alportante,  
Jamŝidon prenos, Kajkobadon ankaŭ.
- 10 Nu ; prenu ĝi, do, ilin ! Kial ni  
Pri Kajkobado zorgos ? Tie ĉi,  
Rustum' kaj Zalo ne pli grave estas  
Ol la vespermanĝad' al vi kaj mi.
- 11 Ripozu ni ĉe tiu ĉi herbejo,  
Jus inter la dezerto kaj plantejo ;  
Neniel je Sultan' au sklavo pensu,  
Kaj lasu la Mahmudon al reĝejo.
- 12 Versolibret' sub arbo tie ĉi,  
Kruĉo da vino, pano nur, kaj vi,  
Kantante dolĉe en dezerto, jen !  
Dezerto estus Paradiz' por mi !

## RUBAIYAT OF OMAR KHAYYAM.

(Translated from the Persian by Fitzgerald).

- 1 Wake ! For the sun who scatter'd into flight  
The stars before him from the field of night,  
Drives night along with them from heav'n,  
and strikes  
The Sultan's turret with a shaft of light.
- 2 Before the phantom of false morning died,  
Methought a voice within the tavern cried,  
"When all the temple is prepared within,  
Why nods the drowsy worshipper outside !"
- 3 And as the cock crew, those who stood before  
The tavern shouted—"Open then the door !  
You know how little while we have to stay,  
And, once departed, may return no more."
- 4 Now the New Year reviving old desires,  
The thoughtful soul to solitude retires,  
Where the white hand of Moses on the bough  
Puts out, and Jesus from the ground suspires.
- 5 Iram indeed is gone with all his rose,  
And Jamshyd's seven-ring'd cup where no one  
knows ;  
But still a ruby kindles in the vine,  
And many a garden by the water blows.
- 6 And David's lips are lockt ; but in divine  
High-piping Pehlevi, with "Wine ! Wine ! Wine !  
Red Wine !" —the nightingale cries to the rose  
That sallow cheek of hers to incarnadine.
- 7 Come, fill the cup, and in the fire of spring  
Your winter-garment of repentance fling ;  
The bird of time has but a little way  
To flutter—and the bird is on the wing.
- 8 Whether at Naishapur or Babylon,  
Whether the cup with sweet or bitter run,  
The wine of life keeps oozing drop by drop,  
The leaves of life keep falling one by one.
- 9 Each morn a thousand roses bring, you say ;  
Yes, but where leaves the rose of yesterday ?  
And this first summer month that brings the  
rose  
Shall take Jamshyd and Kaikobad away.
- 10 Well, let it take them ! What have we to do  
With Kaikobad the Great, or Kaikhosru ?  
Let Zal and Rustum thunder as they will,  
Or Hatim call to supper—heed not you.
- 11 With me along the strip of herbage strown  
That just divides the desert from the sown,  
Where name of slave and Sultan is forgot—  
And peace to Mahmud on his golden throne !
- 12 A book of verses underneath the bough,  
A jug of wine, a loaf of bread, and Thou  
Beside me singing in the wilderness—  
Oh, wilderness were Paradise enow !

(V. 4—The Persian new-year begins with the vernal equinox. The "white hand of Moses" is a figure for Spring blossoms).  
(V. 10—Rustum is the Hercules of Persia ; Zal, his father).

## DIVERSAJ AVIZOJ.

Dankojn! Koregajn dankojn! La rezultato de la korespondado pri la uzo de supersignoj estas bonega, kaj plene pravas, ke ĉiulandanoj kunpensas pri la afero. Mi nur estas ricevinta ĉirkaŭ dudek kvin de la petitaj poŝtkartoj, kaj, *kvankam mi ne ilin demandis*, mi ricevis centojn da varmegaj protestoj. Tiu ĉi pravas ke la Esperantistoj multe interesiĝadas je la lingva afero, kaj ke ili ne estas nezorgemuloj. Tamen, kelkaj amikoj diris al mi: "Oni ne zorgos pri la afero." Tial mi nur demandis, ke la plenduloj skribu al mi, ĉar mi bone sciis ke tiuj ĉi ne estis la plimulto da la Esperantistoj, nek en Anglujo, nek aliloke.

Nu, trankviliĝu, karaj Legantoj. Mi neniam sendos al vi sensupersignan Gazeton, ĉar nek mi, nek vi, deziras ĝin legi. (Kaj mi certe estas la plej interesita el la legantoj de THE ESPERANTIST!) Dank' al viaj penadoj, mi nun, pli ol iam antaŭe, fidas je la bela estonteco de nia kara afero. Al tiuj fervoraj amikoj, kiuj kontraŭdiras la supersignojn ĉar ili deziras skribi al la Gazetaro Esperante mi diros: "Faru tion, kion mi estas farinta. Skribu vian Esperantan leteron, sen la bezono de supersignita litero." Estas facilege tiun ĉi fari. Antaŭ kelkaj tagoj, nia fervora kunbatalantestro, Sinjoro Bourlet, skribis tutan kolonon sen supersigno.

Tiam, se la Redaktoro ne presigas vian leteron, ne plendu kontraŭ la supersignoj, sed kontraŭ la antaŭjuĝo de la Redaktoro. Sed, kompreneble, nun tiel, kiel antaŭe, vi ĉiam povas laŭbezone uzi la literon H anstataŭ la supersigno, por telegrafi, presigi, k. t. p.

Sed alie vi ne devas fari. Vi ne devas elpensi vian propran Fonetikan Alfabeton. Vi devas skribi Esperanton, por ke vi estu Esperantisto.

\* \* \*

KARA SINJORO,—Signoj ne mankas, ke la temo de lingvo internacia interesas ĉiun tagon pli kaj pli la homojn pensantajn de la mondo. Estas societo internacia da lingvistoj, kiu sin nomas Societo Internacia Fonetika (Association Phonétique Nationale). Ĝi havas ĝian centran oficejon en Parizo, sed la membroj apartenas al dek sep diversaj nacioj, kaj enhavas la plej progresajn profesorojn kaj instruistojn de modernaj lingvoj el ĉiu civilizita nacio. Ĝi estas ekzercinta fortan influon sur la edukadaj oficejoj de Francujo kaj Germanujo, kaj estas tiamaniere tute aliforminta la instruon de modernaj lingvoj en la lernejoj de tiuj ĉi du grandaj nacioj. La Societo havas monatan gazeton, *Le Maître Phonétique*, kaj oni

komencas diskuti en tiu ĉi gazeto la temon de lingvo internacia. Malfeliĉe estas iuj da la plej influemaj membroj, kiuj havas fortan antaŭjuĝon kontraŭ lingvo artefarita, kaj tiun ĉi monaton ili estas antaŭmetintaj proponojn pri la ekzemo de tiu ĉi temo, kiuj estas tute malamikaj eĉ al la konsiderado de la meritoj de nia kara lingvo. Sed tiu ĉi povas nur helpi nian kaŭzon.

Ĉar estas bonaj Esperantistoj en tiu ĉi klerega Societo, kiuj scios bone kiel batali pro la vero kaj pro la kara lingvo, kontraŭ ĉiuj; kaj la rezultato povas nur esti, ke la meritoj de Esperanto fariĝos konataj al multe da la plej kapablaj lingvistoj de Europo; kaj la kulpo estos la nia, se ni ne gajnos iujn da ili por nia kaŭzo.—Via,

R. J. LLOYD, D.Litt., M.A.

\* \* \*

SINJORO,—Antaŭ tri semajnoj mi sciigis je la unua fojo pri la naskiĝo kaj la kreskado de Esperanto, leginte bonegan artikolon kiun pri ĝi eldonis Sir William Ramsay, per la *Daily Mail*. Tuj kiam mi estis aĉetinta la libreton nomatan *The Student's Complete Textbook* mi eklernis entuziasme la lingvon dum miaj ĉiutagaj vojaĝoj per vagonaro inter Londono kaj Brajtono (Brighton), kie mi vivas, demirinte ĝian simplecon kaj la facilecon per kiu oni povas ĝin ellerni. Permesu, tial mi petas, Sinjoro Redaktoro, ke unu el la Geesperantistaro konigu al vi la plezuron kiun li estas eltirinta je tiu ĉi afero. La celo tamen de tiu ĉi letero estas demandi al vi, ke vi bonvolu al mi sciigi, ĉu troviĝas en Brighton grupo aŭ sekcio Esperantista? Se ne, mi volus doni miajn malgrandajn servojn por ĝin efektigi, agante, kompreneble, sub via afabla direkto, aŭ tio de kelkaj aliaj personoj, kiuj estos havintaj spertadon pri tiaj aferoj. Efektive mi zorgos treege disvastigi la lingvon kiel eble plej mi povos.

Al mi ŝajnas ke Brajtono devas fariĝi utila centro Esperanta por ĝia alprenado, kaj mi estas certa ke mi ricevos la korajn kunlaboradojn kaj bondezirojn de ĉiuj, kiuj volegas antaŭenirigi la interesojn de nia kara lingvo. Kun saluto.—Via,

D. H. LAMBERT (B.A., Oxon),

59, St. Aubyns, Hove, Sussex.

*Jen la laŭvortu letero de nova Esperantisto, kiu lernis la lingvon en vagonaro!*

Kompreneble, mi esperas ke ĉiuj najbaraj amikoj je nia Afeno helpos nian novan apoganton, je la fondigo de forta grupo en Brighton. Ĉiam antaŭen! Ni kreskadu!

\* \* \*

*La Universitato Londona* kaj la *Teachers' Guild* faras libertempan kurson de Julio 18 ĝis Aŭgusto 12, kaj la Sekretario deziras ke mi anoncu jena.

Tiuj studentoj, kiuj ne povos ĉeesti antaŭ la fino de Julio, povos partopreni je la dua periodo da du semajnoj, kaj por tiuj ĉi oni donos pluajn klasojn. La Kurso traktos pri la Elparolado kaj Kunmetado de la Angla lingvo; La Fonetikoj de Moderna Angla; Moderna Angla literaturo; Sistemoj por la instruado de modernaj lingvoj; kaj paroladoj pri Angla edukado kaj institucioj. Abonpago dum la tuta monato, £2 (50 frankoj). Dum la lasta du semajnoj, £1. Oni esperas ke multe da alilanduloj ĉeestos. Por pluaj sciigoj, skribu al *Director of the Holiday Course for Foreigners, University of London, South Kensington, S.W.*

Bedaŭrinde ne estos Esperanta kurso tiun ĉi jaron kaj la sciigo de la Dijona Universitato devas esti multe pli interesa por la Esperantistaro. Tie ĉi, Profesoro Lambert donos Esperantan kurson de Julio 1 ĝis 31 Oktobro. Abonpago, je la kvar monatoj (ĉiuj temoj), £2 (50 fr.) 30 fr. po ses semajnoj. Esperantistaj studentoj povas esti certaj, ke ili trovos en Dijono plej koran Esperantistan akcepton. Oni konsilas, ke ili kunportu kun ili siajn biciklojn, ĉar la ĉiarkaŭtajoj estas tre belaj, kaj la vojoj tre taŭgaj. Por ilustrita broŝuro priskribanta la tutan kurson, skribu al *Sro. Lambert, Profesoro ĉe la Universitato, Dijon, France.*

La Redaktoro esperas, ke kolkaĵ Anglaj kunbatalantoj partoprenos je tiu ĉi kurso, kiu estas la unua libertempa kurso enhavanta instruadon de Esperanto.

\* \* \*

La dua numero de la *Internacia Scienca Revuo* siatempe aperis, kaj enhavas longan artikolon pri la *N Radioj*, kaj valorajn raportojn pri la lastaj medicinaj progresoj kaj fizikaj Sciencoj. Tiu ĉi Gazeto vere estas tre grava ilo, kaj ni esperas, ke ĝi ricevos la apogon, kiun ĝi meritas. La kosto de specimeno de la unua aŭ dua numero, kune kun propaganda folieto en Angla kaj Esperanto estas sep pencoj afranke.

\* \* \*

La Ilustrita Poŝtkarto povas esti amiko je nia afero, sed ankaŭ, se oni ne zorgos, ĝi fariĝos malamiko. Eble estos utile tie ĉi doni kelkajn sciigojn pri la sendo de tiuj ĉi.

Oni neniam devas meti la poŝtsignon sur la ilustrita flanko, sed ĝi devas esti samflanke kun la adreso. Se oni alie faras, la ricevanto devos pagi pluan 30 centimojn.

Kaj, se oni deziras sendi la poŝtkarton duonpreze, oni devas elstrecki la vortojn *Carte Postale*, kaj anstataŭi "*presaĵo*, aŭ *Imprimé*." Kaj oni ne

devas skribi plu ol la adreso, kaj la nomo de la sendanto, kaj, eble, la dato. Tiam la kosto nur estas 5 centimoj (one halfpenny).

\* \* \*

KARAJ SAMIDEANOJ,—Kun la intenco fari de ili donacon al nia estimata Majstro, Doktoro Zamenhof, mi petegas, ke vi aminde sendu al mi neilustritan poŝtkarton enhavante la sekvantan Kredon:—

"Mi sincere kredas ke Esperanto estas la sola solvo de tre grava problemo de la Homaro: helpanta ŝlosillingvo; kaj mi ĉiam rigardos ĝian absolutan netuŝeblecon, kiel la simbolo de nia forteco kontraŭ atakoj kaj malamikoj de nia verko."

Kaj aldonu vian nomon kaj adreson.

Tiam, kiam mi ricevis almenaŭ kvincent da tiuj p.k. mi, antaŭ sendi ilin al la Estro, presigos libreton enhavantan la superan kredon kaj la nomojn kaj adresojn de aliĝantoj.

La kosto de la libreto estos sciigata pli malfrue al personoj kiuj deziras ĝin aĉeti.

Mi ankaŭ esperas ke tiuj, kiuj deziras korespondadi pri iaj temoj kun niaj kungrupanoj, Trinitade bonvolos skribi al mi.—Fidele via,

G. O. MESSERLY,

Port of Spain, Trinidad, B.W.I.

\* \* \*

Turistoj, kiuj deziras veni Rioluton, devos sin turni al Grafo Albert Gallois, Sekretario de la Grupo, Riolutato, Prov. de Modena. Italujo. Grafo Gallois ankaŭ estas la Redaktoro de la monata Itala Organo *L'Esperantista* (jarabono 4 frankoj).

\* \* \*

La Rondiranto de Aprilo enhavas tre interesan skizon de vojaĝo en Montenegro. Oni devas gratuli Sinjoron Kolovrat Ĉervinski pri sia vojaĝo en tiu ĉi preskaŭ nekonata lando.

\* \* \*

Alice in Wonderland estas mirinda libro, kaj la ideo falis en la kapon de fervora apoganto ke estus tre bona ideo ĝin traduki en Esperanto. Komprenoble, oni devos ŝanĝi multe da la ŝercoj, kaj tiel plu, sed mi esperas ke ĉiuj, kiuj povas sendi kelkajn pecetojn, Esperantajn ŝercojn, kaj aliajn taŭgajn, tiel faros kiel eble plej baldaŭ.

La Rev. R. A. Davis, Broxwood, Pembridge, Herefordshire, afable klopodas pri tiu ĉi malfacila afero, kaj espereble, se Esperantistoj kunlaborados, nia literaturo gajnos novan, kaj tre indan verkon.

LA REDAKTORO.

## EL HINDUJO.

SINGRIBARI HÂT, P.O., ASSAM,  
Feb. 27, 1904.

KARA SINJORO,—

Ĝis nun mi ne havis libertempon sufiĉan por skribi al vi longan leteron. Sed sendube vi tion facile komprenos, ĉar tia ĉi vivo estas tuta ŝanĝo, kaj mi sentas, ke mi loĝas en alia mondo.

Ni lasis Londonon en malvarmega blovado kaj pluvo. La vetero estis vere vintro. Dum la sekvantaj tagoj, vojaĝantoj restis en siaj kajutoj, dume la flava vizaĝa reĝo super ĉiuj reĝis. Tamen, post kvar tagoj, la minacaj nuboj estis anstataŭata de la varma sunbrilo kaj la frenezaj ventoj de ĝentilaj blovetoj. La cetervojaĝo estis kvieti kaj ĝojinda, krom en la Ruĝa Maro, kie la suno estis senplezure varmega. Ni pasigis du tagojn en la Kanalo Suez, pri kiu mi fariĝis tre interesata. Ĝiaj sepdek mejloj estas tranĉitaj tra la nudema sabla Arabdezerto. Ni vidis kelkajn kamelarojn kaj unu aŭ du vilaĝojn de sunsekita koto, ĉirkaŭita de daktilujoj. Kaj, starante sur la promenejo de la granda mariranta ŝipo, dum la vidaĵo estis limata ĉiuflanke de la eternaj sabloj, mi vere sentis ke ni estis senrajtuloj en tia ejo.

Je la 4 Februaro ni alvenis ĉe Kalkuto, kie mi loĝis du tagoj, tre okupita de la aĉetado de taŭgaj vestoj kaj litkovriloj: tie ankaŭ mi unue ekdormis en moskito kurtenoj.

Tie ĉi mi vizitis Sinjoron P., kies adreson vi donis al mi, kaj vi estos interesata scii ke li estas Hinduo, kaj ankaŭ instruisto. Li esperas akiri la lingvon mem, kaj fine instrui siajn Hindajn lernantojn. Mi penos lin teni je lia parolo per korespondado.

Post maltrankvila veturo, nokte, en vagonaro al Goalundo, mi suriris sur riveran vaporŝipan, kiu faris zorgindan vojaĝon de kvar tagoj per la Brahmaputra Rivero; ĝi multfoje surkuris sur subakvajn sablaĵojn, kaj unufoje estis tiamaniere tenata dum dudek horoj, kiam du aliaj ŝipoj alvenis kaj, tirante, liberigis ĝin. Mi ŝiplasis ĉe Rangamatti Ghat meznokte: le ejo estis plena je Hindoj kaj Asamanoj, sed neniu estis tie por renkonti aŭ helpi min, kaj tre malkonvene estis zorgi mian pakadon. Mi pasigis la nokton en proksima neokupata Bungalo, kie mi fariĝis mangaĵo de la moskitoj. Matene mi eltrovis, ke elefanto min atendis. Li ĵus estis leviginta el la longa herbo, kaj lia atentisto estis senpolviganta lian dorson.

Tiam sekvis tre skuega, tre polvega, kaj tre varmega rajdo kvindek kvar mejlojn longe, kiuj okupis tri tagojn. Ĉiunkote mi loĝis ĉe iu plantisto, ĉar la kutimo en Asamo inter Eŭropanoj estas—  
*Via domo pro ĉiu, kaj ĉies domo pro vi!*

Estas kvar aliaj Eŭropanoj sur la Ĝardeno, kaj ĉiu loĝas en aparta bungalo. Estas pli ol kvarmiloj da Kulioj (Coolies). En unu tago mi vizitas kelkcentojn da preskaŭ nudaj ĉokoladkolorajn virojn. Multaj ligas sian longan baron poste, simila al virino, kaj siaj koloj estas ĉirkaŭataj de koljuveloj. Mi trovas grandan malfacilecon lerni ilian lingvon, ĉar estas tia malkomprenbla miksaĵo de Asama, Bengala kaj Kaĉara, treege distranĉita; kaj malfeliĉe, neniu el miaj kolegoj povas ŝpari la tempon por instrui min. Sed estas mirinde kiel neceseco agemigas onies pensilon, kaj mi jam akiris sufiĉe pro mia nuna postulo.

Nia ĝardeno estas du mejloj longe kaj unu mejlo larĝe. Ĝi estas limata de la dika arbarego (Junglo) kiu senrompe atingas al la proksimaj Himalajaj Montegoj, kaj kiu estas enloĝata de multaj sovaĝaj bestoj, precipe ursoj, elefantoj, tigroj kaj leopardoj, kiuj ofte eraras en la ĝardenon por ataki la laboristojn.

Nune la vetero estas perfekta, sed, kompreneble, dum la pluvado, kiu komenciĝas en Majo, estos tute malsama. Mi sendas al vi kelkajn foliojn de mirinda ruĝa arbo, kiu kreskas en la ĝardeno.

Adiaŭ, mia estiminda amiko.

Via sincere,  
A. T. SIMPER.

## HINDAJ PROVERBOJ.

“Maljuna Sinjoro Howell” priskribas la elementaĵojn de rava proverbo esti: *Senco, Mallongeco, Salo*. Je tiuj ĉi, kaj precipe je la *Salo*, la Hindoj superas sin mem. Kompreneble, inter la miloj da proverboj Hindaj, devas esti multaj, kiuj ne alvokas la okcidentan spiriton, sed, por montri kiel lerte ili esprimigas siajn ideojn, mi citas tiujn ĉi malmultajn specimenojn.

(1). Ĉu la tranĉilo falas sur la melonon, aŭ ĉu la melono falas sur la tranĉilon, estas same. La melono estas tranĉata.

(2). Oni ne povas vidi Paradizon sen mortu.

(3). Kiu forgesas matene, sed memoras vespere, ne nomigas forgesulo.

(4). Se homo ridas, li ridas je alioj; se homo ploras, li ploras je si mem.

(5). Dorno eniras riĉulon, kaj miloj kuras lin helpi: Malriĉulo falas de alta monto, kaj neniu proksimiĝas je li.

## PRI LA DORMA-MALSANECO.

Tradukita de P.H.

Dorma-malsaneco, kies kaŭzo longe restis nesolvebla problemo, fine cedis sian sekreton, dank' al la laboradoj de Lt.-Kolonelo Bruce, Doktoro Nabarro kaj Kapitano Greig.

Ili uzis la eltrovon de Doktoro Castellani, ke malgrandega sangparazito, nomita "trupanosom' o" ĉeestis en la cerebrospina fluaĵo de iaj malsanuloj, suferantoj de tiu ĉi malsaneco, kaj kiu eltrovis, ke tiu ĉi parazito kaŭzas la dorman malsanecon, same kiel kulo kaŭzas malarion.

Mallonga priskribo pri la simptomoj de dorma-malsaneco eble estus interesa.

Apatio kaj senvigleco multe aperas. La suferantoj havas grandegan manĝbezoon, kaj ofte petegas manĝaĵojn, kiam ili estas tiel malfortaj kaj dormemaj, ke ili ne povas manĝi. Aliaj vere fariĝas marŝantaj skeletoj, kaj aliaj akvoŝveligas.

Muskola tremado kaŭzas haltantan iradon. Poste, ili kuŝas en profunda letargio. Ŝvelo de la limfaj glandoj estas ofta simptomo, kaj kelkaj kuracistoj opinias ke tiu igas la malsanecon. Ili tial eltranĉas la ŝvelitan glandon. La dormemo ŝajne ne estas vera dormo, sed letargio, kiu rigidigas la kapablon. Efektive oni dubas, ĉu la suferanto dormas tiom, kiom li dormus dum saneco. Multoj mortas dum varmega febro, sed egala numero mortas kiam la temperaturo estas sub-normala.

Morto estas la neevitebla fino de tiu ĉi terura

## LA POSTENO DE ROBBIE.

La korteto havis tre militan vidigon. Tie estis soldatoj kun bataliloj, oficiro kun ligna glavo, fiera knabo kun standardo tro granda por li, kaj bando da muzikistoj kiu furioze batadis ĝaje pentritan tamburon.

Nur malgranda Robbie malĝoje sidis sur la ŝtupoj, kaj rigardis. Perfida peceto da glaso kripiligis lian piedon, kaj li ne povis marŝi tiel rapide, kiel la militistaro. "Mi ne povas ion fari," li diris ĉagrenege. "Jes, vi povas," respondis Kapitano Fred, "vi povas ekkrii *Hura!* Kiam ni preteriras." La knabeto do gardis sian postenon, observante tutan la marŝadon kaj remarŝadon. Ofte la roto iris aliloken, sed li neniam mankis svingi sian ĉapeton, kaj levi sian fajfan aplaudon, kiam ili trapasis.

Robbie estas la vera heroo. Ne estas facile ekkrii "*Hura*" pro tiuj, kiuj povas antaŭeniri kiam ni estas devigitaj halti; ne estas facile forgesi nian propran malkontentigon, kaj aplaŭdegi tiujn, kiuj faras tion, kion ni deziras, sed ne povas, fari; ne estas facile ĝoji je la sukceso de tiuj, kiuj posedas la lokon, kiun ni deziras okupi.

Nur granda koro povas stari aparte, kaj ekkrii "*Hura*" kiam la aliaj preteriras.

Tradukita de C. S. BICKNELL.

malsaneco, kaj okazas jen post malmultaj monatoj, jen post du aŭ tri jaroj. Ĉiu suferanto de dorma-malsaneco ekzamenita de la supre nomitaj sinjoroj evidentigis la ĉeestadon de la trupanosom' en la cerebrospina fluaĵo. Oni ne povas ĝin trovi en tiu de landanoj, kiuj ne suferas de tiu ĉi malsaneco.

Tamen oni trovis trupanosom'ojn en la sango de dudek ok procent da landanoj loĝantaj en la dorma-malsaneca kvartalo; sed neniam aliloke.

Oni kredas ke tiaj personoj kredinde ekmalŝanĝis.

Gravaj simptomoj ne aperas ĝis la parazito eniras la cerebrospinan fluaĵon.

Tiu ĉi malsaneco ne similas je malario, ĉar ĝi ne kuraciĝas per kinino. Oni nun ne dubas ke la *cici muŝo* (tsetse, *glossina palpalis*), sangsuĉanta muŝo, transportas la malsanon de persono al persono, same kiel la mikrobo malarie (*plasmodium malarie*) faras. La sekvanta eksperimento pravas la rolon, kiun la *cici* ludas en tiu ĉi afero.

Multe da tiuj ĉi muŝoj sin regalas sur dorma malsana suferanto. Tiu ĉi ŝajne ne sentis iliajn pikojn. Ili tiam estis portataj al sana simio, kiu baldaŭ malsaniĝis, kaj fine mortis, montrante la kutimajn simptomojn. Oni ankaŭ trovis en lia sango kaj cerebrospina fluaĵo la trupasonon'ojn. Oni trovis la saman rezultaton post kiam oni estis enŝpruciginta aŭ la sangon, aŭ la fluaĵon de la malsanulo en la simion.

## LA STRABULINO.

Ĉu vi ne opinias, ke oni povas ĝuste nomi la sekvantan anekdoton *Antikva Historio*, ĉar maljuna Franca Sinjorino rakontis ĝin al mi antaŭ sesdek jaroj!

Ĝi okazis en Francujo, dum periodo de politika tumultego kaj maltrankvileco. Neniu sciis kion atendi.

Sinjorino altranga, iom sciema, sed kiu estis ankaŭ malfeliĉe strabulino, renkontis, je vesperkunveno, politikiston. Ŝi komencis lin demandi pri tiu ĉi kaj pri tiu afero, esperante tiamaniere eltrovi kelkajn ŝtatajn sekretojn.

La diplomato ĝentile, sed artifice, respondis, kaj la sinjorino gajnis nenion.

Fine, ŝi koleriĝis, kaj ekkriis: Nu, diru al mi, mi petas, kiel iras la politikoj?

La ministro tuj respondis: Tiel, kiel vi *vidas*, Sinjorino, *tre malrekte*.

E. J. CATT.

En malgranda Irlanda urbeto antaŭ nelonge troviĝis pastro, kiam ĉiam predikis, ke ni devas ami niajn malamikojn. Unufojon, dum li estis iranta preĝejon, li renkontis ebrulon, kaj diris: "Ĉu vi ne scias ke la vino estas via malamiko?" "Jes," li respondis, "sed ĉu vi ne predikas ke ni devas ami niajn malamikojn?" Tiu ĉi estas vera, sed mi ne diris ke vi devas ilin glutii.—P. DE B.

## CORRESPONDENCE NOTES.

In reply to numerous inquirers, I regret to state that the Edition of the First Number is exhausted. Intending subscribers can commence with No. 2, or any succeeding issue.

If they will let me know what price they are prepared to pay for the first number, I will try and buy some in.

How to tell the time in Esperantoland. This is a troublesome matter, for two systems are in vogue, the German and the English. I was surprised to find that French Esperantists generally use the former, and, instead of saying *la kvar kaj duono*, for *half past four*, they say *la duono de la kvina*, the *half of the fifth hour*. We English must take care to remember this peculiarity, or we shall get into trouble.

The difference between *Ĉia* and *Ĉiu* is as follows: *Ĉia* means *all sorts of*, whereas *Ĉiu* simply means *all*, without regard to kind. The same rule applies to *Tiu*, *Tia*; *Kiu*, *Kia*.

C.G.S.M. proposes that a column should be printed each month, in which the roots and affixes are divided by hyphens. If other readers will send the same request a trial shall be made.

But readers of THE ESPERANTIST have generally got beyond the *hyphen stage*, surely.

I have to thank H.W.R., of Ipswich, for the following ingenious method of remembering those difficult correlative words *Ia*, *Tia*, *Ĉia*, *Nenia*, and the like, on pages 42 and 43 of the Textbook. As there can be no Royal Road to learning, such devices as these are most useful as aids to the memory.

This is R.'s epitome,  
Pages forty-two and three.

*I-Ĉi-, Ki-, Neni-, and Ti-,*  
Then add *-a* for *Quality*.

*-al* for *Motive*, *-am* for *Time* ;  
*-e* for *Place*, excuse the rhyme.

*Manner-el* ; *Possession-es* ;  
Which must always sound like *face*.

*Thing add-o* ; *-om* *Quantity*,  
*Person-u*, should always be.

Mr. C. W. T. Reeve, 63, Effingham Road, Lee, Kent, is arranging an Esperantist party for Boulogne this Whitsuntide. Will those desirous of joining kindly write at once? Mr. Reeve also wishes to join with fellow Esperantists in walking excursions on Sundays.

## MAJTAGO.

Originale verkita de E. A. Lawrence.

Tiu, kiu volas vidi la unuan tagon de Majo tiel, kiel festita antaŭe ĉie en Anglujo, devas iri al Knutsford, beleta, stranga urbeto en Cheshire, kie, malfeliĉe, ĝia grandega najbaro, Manchester, baldaŭ ensorbigos ĝin. Tie loĝis la du "Cranford" fratinoj, tie oni ankoraŭ montras la lokon, kie herbmanĝis la bovino, vestita en tuko de sia mastrino, post ke ĝi estis falinta en kalkfoson!

Knutsford prenas sian nomon de Knuto, Reĝo de Danujo, kiu ankaŭ fariĝis Reĝo de Anglujo.

Foje li ĝin trapasis, kaj renkontis novedzinon, kiu transiris la rivereton. La piedoj de lia ĉevalo disjetis iom da sablo sur ŝia vesto: de tiu ĉi tempo, Knutsfordanoj havas strangan kutimon, ili disjetas sablon antaŭ la pordo de novedzinoj.

En la bela komuneco de la vilaĝo oni aranĝas la Majtagaj Ludoj.

La unua afero estas elekti Reĝinon; kaj mi pensas, ke ne ŝia boneco, sed ŝia beleco estas la ĉefa penso. Alta stango estas tie ĉi starigata kaj, kun multe da cermonioj, estas ornamata de floroj kaj rubandoj.

Tiam, en granda procesio, venas la reĝino, blanke vestita, sia sekvantaro estante Maid Marian, Robin Hood, Little John, Friar Tuck, kaj aliaj personoj el la antikva Angla fablaro.

Estas ankaŭ la Drako, kaj la "Morris" danculoj. La Reĝino sidigas sur sia ornamita trono kaj kronigas. Nun sur la herbo, oni gaje dancas ludas, trinkadas, kaj manĝadas.

La lokaj eminentuloj venas por vidi, kaj donacas la premiojn. Se la vetero estas bela, la vidaĵo multe plaĉas, sed, alie, estas mizera afero!

Londono mem havas sian Majan Reĝinon. En Walworth, frue matene, je la unua tago de la Maja monato, knabino estas elektita Reĝino. Ŝia aĝo devas esti ĉirkaŭ dek tri, kaj ŝi devas esti la plej bona el ŝia lernejo. Ŝia trono estas en ĉambro, ne sur la herbo. Sed ankaŭ ŝi havas grandan procesion, kaj ŝia veturilo tirigas de la plej bela azeno de la ĉirkaŭaĵoj. La soldatetoj, nomataj The Boys' Brigade fariĝas ŝia gardistaro.

Vere la tago estas tago ĝojega.

Mi ankaŭ memoras, ke kiam mi estis infanino, mi vidis en la ĉirkaŭaĵo de Londono, "Jack-in-the-Green," viro veturante en speco da kaĝo, de herboj kaj floroj kovrata. Jack dancis antaŭ mi, kaj miaj gepatroj opinias, ke li ŝtelis mian pupon, ĉar oni trovis min ekkriantan: "Mian pupon! Malbona-verda viro, mian pupon!"

Sed nunatempe ni ĉiam vidas le vilaĝajn infanojn marŝantajn sur la vojo, portantajn bastonojn florornamitajn, kiuj ofte estas tre beletaj. Ili ankaŭ tiam kantas malnovajn infanajn kantojn.



No. 8.

THE

Jan., 1894.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagandado de la Internacia Lingvo.

EDITED BY DR. COLINGWOOD HODGKIN.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3-14 francs; 1½ roubles; 75 cents.

Published by THE LONDON ESPERANTO CLUB, 41, QUEEN STREET, LONDON, W.1.

## CONTENTS.

|  | Page    |
|--|---------|
| EDITOR'S NOTES   | 113-114 |
| ESPERANTO EN TIENKIN (Professor<br>Chao, Detroit)            | 115-117 |
| APPROXIMACIO DE LA PRIMA (trans-<br>lated by Dr. H. Zamboni) | 118-119 |
| NEKONTROLAJTO (translated by G. C.<br>Law)                   | 119     |
| THE HOLEY FISH (Edward Molyneux,<br>M.A., Oxon.)             | 120-121 |
| COMO ENTI (translated from Italy)                            | 121-122 |
| THE HOLEY FISH (continued) (M.J.I.)                          | 122     |
| THE HOLEY FISH (continued) (continued)<br>by M. J. I.)       | 123     |
| WEEK IN THE MOUNTAINS (trans-<br>lated)                      | 123     |
| CONGRATULATIONS (Paris)                                      | 123     |
| A WOMAN TALKS (Dr. W.)                                       | 127     |
| LETTERS FROM THE EDITORS                                     | 128     |
| LETTERS TO THE EDITORS (continued) (A further<br>instalment) | 128     |

FOR FREE PARTICULARS write to  
the HON. SECRETARIES of  
ESPERANTO SOCIETIES at

|  |
|--|
| COBBLESTONE TYLE M. V. Latham, Esq.,<br>Trinity Terrace.                 |
| DUBLIN, C. Towner, Esq.,<br>15, St. Andrew's Place, St. Stephen's Green. |
| EMBURY, Miss Twanda, M.A.,<br>2, Spring Street.                          |
| GLASGOW, J. Hunter, Esq.,<br>126, Darnley Street, Glasgow.               |
| HUDDESFIELD, G. H. Taylor, Esq.,<br>14, Park Hill Road.                  |
| KIDGLEY, J. Ellis, Esq.,<br>Campan Buildings, New Street.                |
| LEEDS, J. E. Wynn, Esq.,<br>7, Market Street.                            |
| PORTSMOUTH, Dr. Greenwood,<br>122, Queen's Road.                         |
| SPRINGFIELD, H. W. Chapman, Esq.,<br>2, South Street, Cambridge.         |
| PLYMOUTH, J. A. Hill, Esq.,<br>6, Market Street, Plymouth.               |
| ST. ANDREW'S, J. T. Mackenzie, Esq.,<br>120, Market Street.              |
| PLYMOUTH, Alan F. Davidson, Esq.,<br>89, York Street, Plymouth.          |
| WIMBORNE, W. Long, Esq.,<br>Barnes Cottage, Wimborne.                    |

A notice of printing, price, and postage will be sent to  
any subscriber on request. The price of the paper is  
fourpence net per copy. The price of the paper is  
fourpence net per copy.

## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!

THE INTERNATIONAL MACHINE.

Endorsed by list of authority.

The common sense of users of all civilized peoples.

They Remingtonize with the exceptional Model No. 5.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Grandchester St., London, E.C.

## La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMAŝINO.

Prigenu je ŝi!

LA INTERNACIA MAŜINO.

Tute liberigita de ĉiuj limoj.

La komuna imagaĵo por ĉiuj civilizitaj popoloj.

La Remingtono estas ĉiujare la plej sukcesa  
maŝino.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Grandchester St., London, E.C.

## Internacia Sciencia Revuo.

The Latest Issue of our Periodic

All should read in the B-S  
Secretary, Esperanto Club, for a  
free copy of this splendid  
monthly.

Price 30, post free

### Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi.

- J. CASE, Esq., 25, High Street, Keighley, Yorks. Interŝanĝo p.k. ĉiuj lingvoj.
- H. G. CHEVALER, Esq., Post Office, Toronto, Canada. Ĉiam respondeo je p.k. skribitaĵoj en Esperanto.
- M. ALBERT CLAUDE, Sandroux, Meuse, France. Per ĉiuj p.k. Kaj kun Germandeanoj ligantaj en ĉiuj  
lingvoj.
- MISS A. A. COWAN, 30, Gandon Road, Clapham, London, S.W. Interŝanĝo p.k. kun skribuletoj.
- BENNETT PAINCO, Esq., 120, Cranham Park Road, Brockley, London, E.E. Ĉiuj p.k.
- ARTHUR CHAM, Esq., 108, Bethune Road, Stamford Hill, London, N. Per ĉiuj kaj lingvoscience.  
Ĉiam dankema respondeo.
- A. J. HULLAR, Esq., The White Studios, Castle Street, Shrewsbury, England. Kun skribuletoj p.k. ĉiuj  
lingvoj.
- A. JENNINGS, Esq., 16, Savoydala Road, Highbury, London, N. Per valaĵkartoĵoj kun skribuletoj.
- HENRI KAM. HEBB, 71, Friedländer-Kaasergasse, Vienna XVI. Valaĵkartoĵoj. Ĉiam respondeo.
- M. JOSEPH LACROIX, Directeur de la Finance Ministère, 204, Blvd. Raspail, Paris. Ĉiuj p.k.
- MRS ROSE PITCH, Klopstochestraße 52, Berlin, N.W. Interŝanĝo ĉiuj p.k. Kaj p-ŝanĝo.
- D. J. RAYNER, Esq., 138, Munges Road, Forest Gate, London, E. Ĉiuj p-ŝanĝo.
- A. RICHARDSON SMITH, Esq., 33, Ripost Street, Keighley, Yorks. Ĉiam respondeo je Esperantaĵoj ĉiuj  
lingvoj.
- NIKOLAI APAN ČERNOMIROV, Bourgas, Bulgaria. Ĉiuj p.k. kun skribuletoj.
- A. SHULMAN, Esq., 17, High Street, New Paltz, Scotland. Interŝanĝo ĉiuj p.k. Kaj p-ŝanĝo.
- A. F. WHITING, Esq., Box 2847, Schaumburg, Tennessee, U.S.A. Per ĉiuj p.k.

La Kusto de la Esperanta Esperanto, Bd. (100 per publikigoj).

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAGOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Cnurtrai.  
CANADA.—A. Saint Martin, Esq., 79, St. Christopher Street, Montreal.  
FRANCE.—M. Paul Fruitier, Boulevard Arago 27, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—G. B. Smith, Esq., 19, Wiborg Quay, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.  
TRINIDAD.—Geo. O. Messerly, Esq., Port of Spain.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtsignon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povus sendi la abonpagon per poŝtsignoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

No. 8.

JUNIO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

La Hon. Sek. de la London Esperanto Club multe bedaŭras, ke lia amiko kaj kolego, S<sup>ro</sup> Howard, ne povos klopodadi pri la libraj aferoj. Ĉiuj Esperantistoj ŝuldas al S<sup>ro</sup> Howard koregan dankesprimon pro liaj sindonema laborego, kaj bedaŭros, ke liaj nunaj devoj ne permesas gian adon.

Estonte, oni devas sendi ĉiujn *librajn mendojn* al The Librarian, London Esperanto Club, 41, Outer Temple, London, W.C., kaj ne al Surbiton.

Karaj Legantoj, Salutojn!

Se la maro estos estinta kompata, areto da Anglaj Esperantistoj estos reveninta de mallonga forestado dum la Pentekostaj tagoj en Bulonjo.

Mi vere devas danki Vin pro la multe da afablaj rimarkoj de la skizeto pri mia libertempeto inter la Esperantistoj, kaj estas eble, ke rakonto pri la Bulonja vizito ankaŭ interesos Vin. Estos do artikoleto pri ĝi en la venonta Gazeto.

Kiam mi ĝuis la Italan sunon, Esperanto gajnis novan apostolon, kies verko jam vidigis en *La Esperanta Gazeto*. Estas certe, ke Vi ĉiuj multe ŝatos la tre interesan kaj lertan tradukon el la *Aventuroj de Grafo Ferdinando Fathom*, de S<sup>ro</sup> Lambert verkita. Kaj, kiam Vi memoros, ke tiu ĉi klera verkisto nur aŭdis la nomon *Esperanto* antaŭ ses semajnoj, Vi ĉi tie vidos ankoraŭ alian bonan reklamon pri la mirinda facileco de la lingvo!

Inter la multaj novaj aliĝintoj, kiujn ni ĉiutage gajnadas, estas unu kiu intencas viziti la Ekspozicion S. Louisan. Kredeble li tie vidos la Esperantan Sekcion, fondita de la Franca Societo, kaj zorgata de S<sup>ro</sup> J. Constant, 4755, Maffitt Avenue, St. Louis.

The Hon. Sec. of the London Esperanto Club much regrets that his friend and colleague, Mr. Howard, can no longer occupy himself with the book department. All Esperantists owe Mr. Howard most hearty thanks for his devoted labour, and will regret that his present duties do not permit of its continuance.

In the future *orders for books* should be sent to The Librarian, London Esperanto Club, 41, Outer Temple, London, W.C., and not to Surbiton.

Dear Readers, Greetings!

Should the sea have been compassionate, a group of English Esperantists will have returned from a short stay during Whitsuntide in Boulogne.

I really must thank you for the many kind remarks on the short sketch of my holiday with the Esperantists, and it may be that a narrative of the Boulogne visit will also interest you. A short article about it will therefore appear in the coming Gazette.

While I was enjoying Italian sunshine, Esperanto gained a new apostle, whose work has already been seen in *THE ESPERANTIST*. It is certain that you will greatly enjoy Mr. Lambert's interesting and able translation of *The Adventures of Count Ferdinand Fathom*. And, when you recollect that this clever writer only heard Esperanto's name six weeks ago, you will see here yet another good testimony as to the astonishing simplicity of the language.

Among the many new adherents we gain daily is one who intends visiting the St. Louis Exhibition. He will probably see the Esperanto Section there, founded by the French Society, and superintended by Mr. J. Constant, 4755, Maffitt Avenue, St. Louis.

Por tiu ĉi Ekspozicio oni presigis grandajn anoncpaperojn pri Esperanto, kaj S<sup>ro</sup> Bourlet afable sendis al ni aron da ili en la Angla lingvo presitan. Mi plezure sendos senpagan specimenon al ĉiu, kiu promesos elmontri ĝin en konvena loko.

Esperable tia Ekspozicio en la Unuiĝitaj Ŝtatoj vekigos multe da intereso. Esperanto jam ekprogresa tie, kaj fervora kunhelpanto, S<sup>ro</sup> J. Fogg Twombly, 34, Green Street, Brookline, Mass., prenis sur sin la provizoran Sekretariecon. Ĉu ĉiuj Amerikaj amikoj skribos al li, kaj kunlaborados?

S<sup>ro</sup> Twombly komencis sian propagandon per nova plano. Ĉiam ni vidas, ke la Amerikanoj sendas novajn ideojn al Eŭropo; ne vere? Li sendis abonpagojn je *La Esperanta Gazeto* por ĉiuj la Amerikaj Universitatoj, kaj kelkaj kolegioj. Tiel, inter la legantoj de tiuj ĉi linioj troviĝas niaj kunbatalantoj, la Amerika Junularo.

*Ĉiam antaŭen!* estu via devizo. Ne permesu ke Eŭropo venkos sole en tiu ĉi nobla afero!

Lia plano memorigas al mi, ke kelkaj el Vi petis la sendadon de tiu ĉi Gazeto al diversaj Urbaj Bibliotekoj. La propono estas tre valora, sed, je la komenco de tia entrepreno, ne estas eble ĝin alpreni. Mi do esperas, ke Vi, post kiam Vi gajnis la aprobon de la Bibliotekestro, afable konsentos *adoni por la Biblioteko*. Por tiu ĉi celo, oni akceptos duonpagon, t.e., jarabonon da du frankoj. Post iom da tempo estos eble malpli ŝpareme donaci.

Mi ankaŭ ricevis kelkajn petojn por pligrandigi aŭ plioftigi la Gazeton. Sed ankaŭ tiu ĉi afero nuntempe estas nebla. Vere, se oni memoras, ke antaŭ nur dudek monatoj, Esperanto estis kvazaŭ nekonata nomo en Anglujo, kaj ke nun dum ok monatoj Anglujo posedas sian propran Gazeton, oni ne devas plendi, ke ĝi enhavas nur dek ses paĝojn! La ekzisto mem de tia Gazeto, precipe apogita de Britaj Verkantoj kaj Abonantoj, estas nekontraŭdirebla pruvo pri la facileco kaj rapida progreso de la Internacia Lingvo: estas praktika pripensinda pruvo.

Ĉu Vi rimarkis la kovrilon de nia lasta kajero? Laŭ la petoj de alilandaj amikoj, mi donis al la verdakovriletaĵo, Esperantan baptonomon, kaj mi esperas, ke Vi, kiuj loĝas alilande, ĉiam nomos tion ĉi *La Esperanta Gazeto*. Kiam mi aŭdis kritikojn pri *LA ESPERANTIST* dum mia vojaĝo, ĉiam estis dube ĉu oni parolis pri la Angla, Franca, aŭ Itala ĵurnalo.

Mi plezure rimarkas ke, en *L'ESPÉRANTISTE*, S<sup>ro</sup> de Beaufront ankaŭ kondamnas tiujn, kiuj deziras elpensi siajn proprajn alfabetojn. Kompreneble ĉiuj Esperantaj Redaktoroj same faros. Jam en la Maja Numero sendis tiun kondamnon

VIA REDAKTORO.

Large Esperanto posters have been printed for this Exhibition, and M. Bourlet has kindly sent a number of them printed in English. I will gladly send a free specimen to everyone who will promise to exhibit it in a suitable place.

It is to be hoped that such an Exhibition in the United States will arouse much interest. Esperanto already begins to make progress there, and a devoted helper, Mr. J. Fogg Twombly, 34, Green Street, Brookline, Mass., has undertaken the provisional secretaryship. Will all American friends write to, and work with, him?

Mr. Twombly has commenced his propaganda on a new plan. We always find that Americans send new ideas to Europe; is it not so? He sent subscriptions for *THE ESPERANTIST* for all American Universities, and some colleges. So, among the readers of these lines are to be found our future comrades, the Youth of America.

*Ever forwards!* let your motto be. Do not allow Europe to conquer alone in this noble cause!

His plan reminds me that some of you have asked for this Gazette to be sent regularly to sundry town libraries. The suggestion is a very valuable one, but, at the beginning of such an enterprise, it is impossible to adopt it. I, therefore, hope that, after you have gained the approval of the librarian, you will kindly consent to send a subscription for the library. For this purpose half will be accepted, that is, an annual subscription of 1/6. A little later it will be possible to give less sparingly.

I have also received some requests to enlarge or more frequently issue the Gazette. But this is also impracticable at present. Really, if one recollects that twenty months ago Esperanto was practically a name unknown in England, and that now for eight months England has its own Gazette, one must not complain that it contains but sixteen pages! The very existence of such a paper, principally supported by British Contributors and Subscribers, is an incontrovertible proof of the simplicity and rapid progress of the International Language: a practical proof worthy of consideration.

Did you observe the cover of the last number? In accordance with the requests of foreign friends, I gave the little green-covered one an Esperanto name, and I hope that all of you who live in other lands will call this *The Esperanto Gazette*. When I heard criticisms of *LA ESPERANTIST* during my journey, it was ever doubtful whether one referred to the English, French, or Italian journal.

I note with pleasure that, in *L'ESPÉRANTISTE*, M. de Beaufront also condemns those who want to invent their own alphabet. Naturally all Esperantist Editors will do likewise. This condemnation had already been sent in the May Number by

YOUR EDITOR.

## ESPERANTO KAJ PEDAGOGIO.

(*Kiam ni kunpromenis sur la bela Kastelejo de Château Thierry, Sinjoro Bourlet afablege cedis al mia peto, kaj promesis verki artikolon por THE ESPERANTIST pri la suprenomita temo. Ni ĉiuj ŝuldas koran dankon al nia eminenta kunbatalanto pro tiu ĉi honoro.—Red.*).

*Kara Amiko, Jen estas la promesita artikolo. Mi ĝin skribis sur miaj genuoj, sidante en arbareto sur altaĵo, inter rosmarenoj kaj erikoj, en ombro de maraj pinoj kaj bastkverkoj.*

*Sub miaj piedoj tute proksime la blua maro bruetis, kuretante sur la flava sablo, la suno faris helajn rondetojn sur mia papero, kaj ĉirkaŭ mi flirtis delikataj papilioj kaj zumantaj muŝoj. La muskoj kaj herbetoj faris verdan tapiŝon, kiu estis kvazaŭa Esperanta standardo, kiu inspiris min. La vekigo printempa de tiu belega naturo igis min pensi pri la baldaŭa vekigo de la homaro por nia kara afero.*

*Kore kaj sincere via.—Carlo Bourlet.*

Jam de longaj jaroj mi instruas matematikon al junuloj. Miaj lernantoj estas nun ĉiuj 17—20 jaraj, kaj mi ofte rimarkis kiel senlogika kaj nekapabla ĝuste rezoni estas ilia spirito. Aliparte, ili estas ankaŭ tro inklinaj ĉion akcepti sendispute, kaj lerni la sciencon ne per analiza metodo, sed preskaŭ kiel dogmon netuŝeblan.

Pri tio mi tre miris.

La infana spirito estas ja tre scivolema kaj treege logika. Malgranda bubo, tuj post kiam li scias iom paroli, faras multajn demandojn: *Kial, patreto, la mara akvo estas sala? Kial, patrineto, la fajro brulvundas la nesagaĵajn infanojn? Kial . . .? kaj ankorau Kial . . .?*

Kaj ofte la gepatroj, tedataj de tiom da kialoj, respondas: *Ĝi estas tiel, ĉar ĝi estas tiel!*

Malbona respondo, kiu al kutimigas la infanojn al akcepto sendisputa de ĉiu ajn eldiro kaj sufokigas la analizemon naturan de ilia juna spirito.

Sed estas tamen gepatroj inteligentaj, kiuj penas por kiel eble plej ĉion klarigi al siaj gefiloj, kaj tamen tiuj gefiloj, post iom da ĉeestado en lernejo, perdas sian tutan scivolemon kaj exploremon.

Kia estas la kaŭzo de tiu bedaŭrinda aliformiĝo de la infana spirito?

Mi serĉis, kaj jen tio, kion mi trovis.

Kiam bubo eniras lernejon, li unue lernas legon kaj skribon. Lerninte la alfabeton, li instruiĝas pri la legado, t.e., pri la kunmetado de la literaj sonoj por formi vortojn. Tuj, de la unua paŝo, ĉu li estas Angla ĉu Franca, li eklernas, ke plej ofte la literoj perdas sian alfabetan valoron, kiam ili estas apudmeti taj apud aliaj. Li konstatas, ke ĉio estas preskaŭ plene arbitra kaj senregula; kaj, kiam Franca lernanteto demandas *kial A kaj U kunligitaj produktas la sonon*

For many years now I have been teaching young people mathematics. My present pupils are all from seventeen to twenty years of age, and I have very frequently noted how illogical and incapable of reasoning precisely is their intellect. They are, moreover, too much inclined to accept everything without question, and to learn science, not by analytical method, but as indisputable dogma.

I have wondered at this a good deal.

The child's mind is assuredly eager to acquire knowledge, and exceedingly logical. A little lad, as soon as he can say something, asks many questions. *Why, papa, is sea-water salt? Why, mamma, does fire burn silly children? Why . . .? and still Why . . .?*

And parents, bored by so many questions, often reply: *It is so, because it is so.*

A bad answer, which accustoms children to the unquestioned acceptance of any dictum, and which stifles the natural analytical propensity of their young minds.

Nevertheless, there are intelligent parents, who take pains to give their children every possible explanation, yet these children, after going to school a while, lose all their thirst after knowledge and their inquisitiveness.

What is the cause of this regrettable transformation in the childish mind?

I have inquired, and here is what I have discovered.

When a lad goes to school, he first learns to read and write. Having mastered the alphabet, he is instructed in the art of reading, i.e., the compounding of literal sounds to form words. Immediately, from the first step, no matter whether he be English or French, he begins to learn that most frequently letters lose their alphabetical value when they are united with others. He finds out that everything is almost entirely arbitrary and

O, la malfeliĉa instruisto povas nur respondi la faman frazon, kiun la bubo tiel ofte aŭdos dum sia vivo: *Ĝi estas tiel, ĉar ĝi estas tiel.*

Post tiu unua senlogika dogmeca ekzercado, la infano komencas lerni gramatikon kaj aritmetikon.

Ho ve! jen denove kaj pli forte rekomenciĝas la bela klarigo: *Ĝi estas tiel.* . . .

En la gramatiko apud ĉiu regulo li trovas unu, du, tri, sennombrajn esceptojn! Tiel, ke la regulo baldaŭ dronas sub la superakvigo de la esceptoj. Ni Francoj faris ja el tio proverbon: *Nenia regulo sen escepto.* Estas vere, ke ĉiuj tiuj esceptoj havas historiajn kaŭzojn, sed tiujn kaŭzojn oni nur tiam povas kompreni, kiam oni scias multajn lingvojn antikvajn kaj modernajn. Tiu studo estas filologio, kaj la filologio ne estas scienco komprenebla por infanoj!

La lernado de aritmetiko povus esti ekzerco jam pli logika sed, el ĉiuj partoj de la mate matiko, aritmetiko estas la plej malfacila en teorio. Dum la algebra rezonado estas plej ofte analiza, la aritmetika rezonado estas plej ofte sinteza, sekve pli malfacile komprenebla.

Kaŭze de la granda malfacileco de la teorioj aritmetikaj, la instruisto estas, vole-nevole, plej ofte devigata lernigi parkere de la bubo la rezultatojn sen ia klarigo, kaj la juna lernanto alproprigas al si metodojn permemore, kiujn li prenas kiel modelojn sekvindajn sed ne verigitajn. Al tio oni aldonas lecionojn el prozaj aŭ poeziaj pecoj, lernotajn ankaŭ parkere, kaj, super ĉio, oni lernigas la historion de la antikvaj Grekoj kaj Latinoj, tute nekomprenebla, pro la granda malsameco de la antikvaj kaj nunaj moroj.

Resume, niaj gefiloj povas nur alveni al unu sola konkludo: Ĉio en la homa scio estas arbitra, senregula kaj senlogika. Se, post longaj jaroj da tia lerneja ekzercado, restas ankoraŭ en nia spirito ia fajrero de logikeco, tio pruvas, ke nia natura logikemo estas vere fortika kaj daŭrema!

Nun, ni esploru tion, kio okazus se niaj infanoj lernus nian karan lingvon Esperanto tuj post la eniro en la lernejon.

Tie ĉi ili trovus plenan logikon. La legado estus nur ludo, la gramatikaj reguloj estus ĉiam senesceptaj. Ĉio estus klarigebla, ĉio povus, kaj devus, esti klarigata. La korekta uzado de la lingvo devigus ilin al severa analizo de ilia penso. Ili malkutimigus skribi kaj pensi laŭ modeloj preparitaj kaj sankciitaj de la popola uzado, kaj, eĉ por la ĝusta esprimo de siaj pensoj en la gepatra lingvo, ili trovus grandan utilon en tiu analizema ekzercado.

devoid of rule; and when a French pupil asks why A and U together give the sound of O, the unfortunate teacher can but reply with the famous phrase, which the child will hear so often during his life: *It is so, because it is so.*

After this initial illogical dogmatic exercise, the child starts learning grammar and arithmetic.

Alas! here again the fine explanation: *It is so . . .* continues to be in vogue.

In grammar, with every rule, he finds one, two, three, innumerable exceptions. Hence the rule is soon drowned under a flood of exceptions. We Frenchmen have actually founded a proverb: *There is no rule without an exception.* True it is that all these exceptions have historical reasons, but these reasons can only be appreciated when one knows many ancient and modern languages. That study is philology, and philology is not a science to be understood by children!

The study of arithmetic might be a more logical exercise, but of all departments of mathematics, arithmetic is in theory the most abstruse. While algebraical reasoning is most frequently analytical, arithmetical reasoning is generally synthetical, and, consequently, more difficult to understand.

As a result of the great difficulty of arithmetical theories, the teacher is, willy-nilly, commonly compelled to make the lad learn results by heart without any explanation, and the young pupil adopts parrot-method, which he takes as models to be followed, but not to be verified. To these are added lessons from prose and poetical extracts also to be learned by rote, and, above all, Roman and Greek history is taught, which is quite unintelligible on account of the great diversity between ancient and modern customs.

In fine, our children can only come to one conclusion: Everything in human ken is arbitrary, devoid of rule, illogical. If, after long years of such instruction, a spark of logicity still remains in our mind, it proves that our natural logicity is powerful and enduring!

Now let us inquire what would happen if our children should learn our valued Esperanto immediately on entering school.

Here they find perfect logic. Reading would be but a game, the grammatical rules would ever be free from exceptions. Everything would be explicable, everything could, and ought to, be explained. Accurate use of the International Language would force them into a severe analysis of their thoughts. They would no longer be accustomed to write and think in accordance with models prepared and sanctioned by popular usage, and even for the concise expression of their thoughts in their mother tongue they would derive great benefit from this analytical exercise.

Mi persone konstatis, ke la studado de Esperanto elmontris al mi multon el mia propra lingvo, kion mi ĝis tiam ne komprenis aŭ ne sentis. Sennombrajn galicismojn, eĉ malĝustajn uzojn de vortoj, mi kun mirego ekvidis.

Priparolante tiun temon kun amikoj Esperantistaj, mi konstatis, ke mi ne estas sola, kiu tiel opinias. Ĉiuj estas unuanimaj.

Ĉu vi, kara Samideano, kiu legis mian artikoleon, ne konsentas ?

CARLO BOURLET.

I, personally, have found that the study of Esperanto has demonstrated to me much of my own tongue, which hitherto I had not understood or appreciated. Innumerable gallicisms, even incorrect use of words, have I discovered with astonishment.

On discussing this subject with Esperantist friends, I have found that I am not alone in thinking thus. All are unanimous.

Do you, dear Friend-in-Esperanto, who read this article, not agree ?

*Laisence tradukita de H.B.M.*

## MIA AVINO.

### Originale verkita Skizo de Esperantisto 8384.

Ĉu vi konis mian avinon ?

Jen do estas ŝia portreto : Ŝi mortis naŭdek ses jara, kaj ŝia kuracisto diris, ke ŝi mortis kiel birdo—eble li volis signifi “pro natura morto,” kaj mi diras : “Pro maljuneco.”

Kia ajn la kaŭzo, mia avino apartenis al belaj tipoj de antikvaj nobelaj maljuninoj, kies pentraĵojn ni rimarkas ĉe antikvaj familioj.

Ĉiam apud la fenestro aŭ trikante, aŭ petante de Dio favorojn por ŝia malgranda familio, ŝi estis, kiel mi ŝin memoras, ankoraŭ bela, spite ŝia maljuneco.—Maloftaj argentaĵoj, bluaĵoj, roza vizaĝo, plenaj vangoj kaj blankaj dentoj—jen estas memora fotografaĵo.

Pri ŝia hejma vivado, mi nur diros, ke ŝi estis vera modelo de korboneco kaj pacienco. Nu, ŝi posedis kuriozan poŝhorloĝon, kiu, ĉiun kvaronhoron, sonadis valson aŭ polkon, per speciala meĥanismo.

Foje, ŝi rakontis al mi tiun ĉi historieton :—

“Tagon mi eniris preĝejon por konfesi min, sed,

ektimante, ke mia konfesprenanto min riproĉus pro mia longa forestado, mi enmetis en mian veston la sonoretantan poŝhorloĝon por ke ĝi, per ĝia sonorado, dolĉigu la ekkolerantan pastron.

“Sed mi multe miris kiam li nenion diris pri mia longa foresto, kaj li paciencie min aŭskultadis. Subite la poŝhorloĝo rompigis la preĝejan silenton ! ‘Kio do estos ?’ demandis la konfesprenanto. ‘Valso,’ mi tuj respondis. ‘Mi bone aŭdas, ke ĝi estas valso, sed kiu estas tiu malpiulo, ludi muzikon dum la konfeso ?’ ektondris la pastro.

“‘Pardonu, pastro, tiu malpiulo estas mia poŝhorloĝo. Jen ĝi estas,’ kaj mi eliris la malfeliĉan valoroĝon, kies sonorado jam ĉesis. Sed, pro mia rapideco, mi tuŝis la muzikan risorton kaj denove ĝi sonadis, sed tiun ĉi fojon mazurkon !

“Mi paliĝis, sed la pastro ruĝiĝis pro kolero, kaj tuj eliris el la konfesejo. Pro tio, mi iĝis kiel ŝtona statuo, kun la poŝhorloĝo ĉiam sonanta la mazurkon al la ĉeestantaj preĝantoj !”

## PRI SCIENCAJ AFEROJ.

Pri la periskopo, la okulo de la moderna submara boato, kaj unu el la plej gravaj kunhelpantoj rilate al ĝi, la *Globe* de Aprilo 15, 1904, en ĝia kolono *Sciencaj Eĥoj*, donas la sekvantan sciigon, kiu posedas specialan intereson, dank’ al la preskaŭa perdo de la Brita submara boato “A1.”

La *Scienca Ameriko* traktas pri tiu ĉi okazintaĵo apud la Nab, kaj rimarkas pri la limigata vido de tiu periskopo, kiu, direktite al la proksimiganta ŝipo, mankis montri la fatalan vaporsipon. Pli-bonigita periskopo antaŭ ne longe priskribiĝis en la Aldono al la *Scienca Ameriko*. Ĝi havas kvin apartajn vitrojn, kvar rigardas je la kvar kvartaloj de la kompasoj kaj ebligas la marveturanto vidi la

tutan horizonton. Kaj la kvina vitro antaŭen rigardas, kaj figuras ĝuste la veran grandecon de la vidataj objektoj.

Tiu ĉi nova periskopo sufiĉas dum klara kaj trankvila vetero, sed, kiel rimarkas la ĵurnalo, “la konfuzoj de blindeco” ekatingas ĉiujn Submarboatojn, kiam blovas la vento, kaj la maro leviĝas. Tiam, pro la subakvigo de la boato, la periskopo luligas, kaj la marŝaŭmo kovras la vitron de la tubo.

Iu devas elpensi metodon por aŭtomate teni la vidlinion de la periskopo en situacio ebena.

T.P.L.

## TERURIGA AVENTURO DE FERDINANDO, GRAFO FATHOM.

De Dro. Smollett, tradukita de D. H. Lambert, Espo. 9660.

Li foriris el la vilaĝo post tagmezo, kondukite de sia gvidanto; jam noktigis, kiam li sin trovis meze de arbaro malproksime de homaj loĝejoj. La mallumo de la nokto, la silento kaj la soleco de la loko, la formoj nedefinitaj de la arboj, kiuj apenaŭ vidiĝis ĉirkaŭe, etendante siajn strangeĝajn branĉojn tra la malklaro, kuniĝis kun lia malĝojo por senordigi lian fantazion, kaj prezenti al lia imago terurigajn fantomojn. Kvankam li ne estis nature superstiĉema, eksterordinara teruro ekplenigis lian animon, kiu, iom post iom, superis tutajn konsolojn de la racio kaj filozofio. Nek lia koro sin sentis libera el la timo de la mortigo. Por ke li foririgu tiujn ĉi malagrablajn revojn, li iniciatis interparoladon kun sia gvidanto, kiu al li rakontis la historiojn de diversaj vojaĝantoj, kiuj estis rabitaj kaj mortigitaj de friponoj en la densaĵoj de tiu mem arbaro. En la daŭro de tiu ĉi rakonto, kiu neniel helpis relevi la pensojn de nia heroo, la kondukanto ŝajnis kaŭzon por malantaŭenigi, dum nia vojiranto daŭrigis siajn paŝojn, atendante lian realvenon post kelke da minutoj.

Pri tio li tamen trompigis; la piedfrapado de la alia ĉevalo fariĝis malplie aŭdebla, kaj fine tute estingiĝis. Pro tiu ĉi cirkonstanco, ektimigite, Ferdinando haltis mezvoje, kaj aŭskultadis je la plej senspira atento, sed nenio rekompencis lian aŭdadon, krom la melankolia sopirado de la arboj, kiuj ŝajne antaŭdiris alproksimantan ventegon. Pro kio la ĉielo kuntiris vizaĝon pli malhelan, la fulmo ekbrilis, ekruĝigis la tondro, kaj la lovegado, ekmetante ĝian voĉon per grandega muĝado, deiris en superakvego. Pro tiu ĉi okazo la kuraĝo de nia heroo preskaŭ tute neniigis; li ja ekperdis la povon de la pripenso, kaj sin trovis efektive malsekigitan antaŭ ol, kvazaŭ rekonsciigante, li elpasis el la vojo por protektiĝi inter la ĉirkaŭkreskantaj arbetoj.

Rajdinte kelkajn hektometrojn en la arbaron, li staris sub areto da altaj arboj, kiuj lin ŝirmetis kontraŭ la ventego, kaj tiel lokite, li konsiligis kun si mem pri tio, kion poste li devos fari. Li divenis, ke sia kondukinto lin estis forlasinta dum kelke da tempo, por ke li anoncu la alvenon de unu rajdanto al rabistaro, kun kiu li konatiĝis, kaj ke li nun devos fali en la manojn al ili, se li ne havos la feliĉon eviti ilian serĉon, kaj sin eltiri el la implikaĵoj de la arbaro.

Timigite de tiuj ĉi antaŭsentoj, li decidis konfidi al la kompatado de la fulmotondro, kiel la malpli malbona el du okazoj, kaj antaŭeniri per ia torda

vojo ĝis kiam li sin liberigos el la arbaro. Li tial direktis la ĉevalan kapon en linion tute kontraŭan al tiu de la ĉefvojo kiun li ĵus estis lasinta, opiniante, ke la rabistoj sekvus per tiu ĉi, por lin serĉi, kaj ke la ideo neniam sin prezentus al ili, ke li volus eliri el la ĉefvojo por trairi nekonatan arbaron je la mallumo de kiel maltrankvila nokto.

Tiamaniere li fine alvenis stepon, kaj, daŭrigis sian vojaĝon, en plena espero atingi vilaĝon, kie sia vivo troviĝus senriska. Tuj li de malproksime ekvidis kandeleton, kiun li rigardis kiel feliĉa steleto, kaj, rajdante tien rapide, li sin trovis ĉe la pordo de solega dometo, en kiun lin lasis eniri maljunulino, kiu, sciigite, ke li estis vojonperdinta vojiranto, ricevis lin gastame.

Kiam li sciigis per la mastrino, ke ne estas alia domo en multe da mejloj, kaj ke ŝi povos provizi al li bonan liton, kaj al la ĉevalo loĝejon kaj avenon, li ekdankas la ĉielon por sia feliĉo, faletinte sur tian modestan kajuton.

Li do konsentis pasi la nokton, sub la ŝirmeco de la maljuna dometanino, kiu lin komprenigis, ke ŝia edzo, tranĉlignisto, estis forinta ĉe la plej proksiman urbon por vendi sian komercaĵon, kaj ke, pro la ventega vetero, eble li nur estis revenonta morgaŭmatene.

Ferdinando ekzamenis la antikvan sorĉistinon per mil ruzaĵaj demandoj, al kiuj ŝi respondis je tiom da verŝajneco kaj naiveco, ke li konkludis, ke ne estas ia danĝero. Festine vespermanĝinte ovojn kaj ŝinkon, li petegis, ke ŝi lin alkonduku al la dormoĉambro, kie ŝi proponis, ke li kuŝiĝu.

Tial, je ŝia monro, li supreniris ian ŝtuparon en ĉambron, meblitan de lito sur kvar apogiloj. La planko estis duonplenigita de pajloŝarĝejoj.

Li ŝajne kontentiĝis je sia loĝejo, kiu ja lin mirigis.

La afabla luigantino, avertinte ke li ne alproksimiĝu la kandelon al la flamiĝemaĵoj, foriris, kaj, ferminte la pordon, turnis la ŝlosilon de ekstere.

Ferdinando, kutimite esti singardema kontraŭ siaj kunuloj, havis gravajn suspektojn, kiam li eltrovis, ke ne estis riglo interne sur la pordo.

Sekve li proponis ekzameni akurate ĉiun objekton en la ĉambro; kaj dum la esplorado li ĉagrene trovis viran korpon, ankoraŭ varman, kiu, antaŭ ne longe ponardite, kaŝigis inter kelkaj pajloŝarĝoj.

Tia eltrovo ne mankis inspiri en la brusto de Ferdinando nedireblan teruron, ĉar li certigis, ke li mem renkontus la saman sorton antaŭtagiĝo, se miraklo ne intervenu por lin protekti. Ĉe la



unuaj transportoj de la timego, li alkuris al la fenestro, intencante per ĝi forkuri, sed li sciigis, ke lia ekflugo efektive estis malhelpita de fortaj feraj baroj. Tiam la koro ekbatis, la haroj ekrektigis, kaj la genuoj ŝanceliĝis. Liaj pensoj estis plenaj de antaŭsentoj de la morto, lia konscienco aperis kvazaŭ atestanto kontraŭ li, kaj per dezirego preskaŭ supernatura li tuj rapidis elpensi rimedojn por sinkonservo. Tion, kion en cirkonstancoj malpli interesaj, lia imagone kuragis, li mem senkompate entreprenis.

Li senvestigis la korpon, kiu kuŝis sangadanta

inter la pajlaro. Ĝin brake alportinte en la liton li ĝin ordigis tiel, kiel prezenti la aperon de dormanto. Tiam, estinginte la lumon, li ekokupis la spacon de kie la korpo estis translokita, kaj, tenante ŝargitan pistolon per ĉiu mano, li atendis la sekvon de tiu bravegco, kiu ofte devenas senpere el la malespero.

Ĉe noktomezo li aŭdis la ŝovadon de piedoj suprenirantaj la ŝtuparon; oni malfermis silente la pordon, kaj li vidis la ombrojn de du viroj promenantaj al la lito.

(*Finigota en la Julia Gazeto*).

## LA PEKETOJ DE EPPIE.

Eltirajo el Silas Marner, de George Eliot, tradukita de G. C. Law.

*Silas Marner, ĝis la alveno de nekonata knabineto ĉe sia dometo, estis ŝparema kaj malfeliĉa teksisto. Li kompatiĝis je tiu ĉi infaneto, donis al ŝi la nomon Eppie, kaj fariĝis kvazaŭ ŝia patro.*

Kiam Eppie havis tri jarojn, ŝi estis ruza, kaj Silas devis uzi sian paciencon kaj sagacecon. Sinjorino Dolly Winthrop, najbaro, diris al li, ke punado estus bona por Eppie, kaj ke ŝi devas esti varmigata, kelkfoje, je mola loko.

“Certe, vi eble povas fari alie,” diris Dolly penseme, “vi povos enŝlosi ŝin en la karbokelo. Mi tiel faris je mia fileto Aaron, ĉar mi ne deziris ekfrapi lin; sed mia koro ne permesis, ke mi lin tie forlasu pli longe ol unu minuto. Tamen la tempo estis sufiĉa por nigriĝi lin, tiel ke li devis denove laviĝi kaj vestiĝi. Tiu ĉi estis tiel bona, kiel bastoneto por li. Tial mi diras via konscienco, Sinjoro Marner, vi devas ion fari, aŭ la ekfrapadon, aŭ la karbokelon. Vi estas la estro, kaj estas necese ke vi kontrolu ŝin.”

Nu, Silas saĝe estis aranĝinta larĝan rubandon, per kiu li ligis Eppie al la teksilo, kiam li estis okupata. Ĝi estis ligata ĉirkaŭ ŝia talio, kaj ŝi povis atingi ŝian liteton kaj sidiĝi tie.

Dum somera mateno, Silas interesiĝis je sia laborado, kaj ofte uzis la tondilon. Eppie aŭdis la kuriozan “klik, klik” kaj, observinte ĝian rezultaton, ŝi akiris la logikan opinion, ke la sama rezultato ĉiam sekvas la saman kaŭzon. La bruo de teksado komencis, kaj Silas senpripense metis la tondilon apud Eppie. Silente, kiel museto, Eppie kaptis ĝin. Tondinte la rubandon, ŝi forkuris, tra la malfermita pordo, en la kampojn, kie la sunlumo invitis ŝin.

Dume Silas pensis ke ŝia konduto estis pli bona ol kutime. Sed, kiam li bezonis la tondilon, la terura okazo klarigis. Li forkuris, kriegante: Eppie, Eppie! kaj esploris la truegojn, en kiujn li kredis, ke eble ŝi estis falinta. . . .

Tiam li trovis ŝin, sidante apud marĉo, ĝaje kunparolante ŝian boteton, kiun ŝi estis uzinta kiel sitelo, por plenigi huftrucon, dum ŝia nuda piedeto komforte kovriĝis je oliv-verda slimo.

Silas, ĝojega je la eltrovo de sia trezoro, ekkaptis ŝin, kaj kovris ŝin je kisoj. Sed, kiam li estis alportinta ŝin dome por la necesa banado, li memoris pri la bezono puni Eppie. La ideo, ke ŝi ree forkurus, donis al li nekutimitan pripenson, kaj li decidigis uzi la karbokelon, kaveton apud la kamento: Eppie! li subite diris, elmontrante ŝiajn kotajn piedojn kaj vestaĵojn: peketema Eppie tiel forkuri! Eppie devos iri en la karbokelon, ĉar ŝi estis peketema! Paĉjo devos meti ŝin en karbokelon!

Li pensis, ke tio timigus ŝin, kaj ke ŝi ekploros. Sed, anstataŭ tio, ŝi ekskuigis sur lia genuo, kvazaŭ la propono estis ĉarma novaĵo. Vidante, ke li devus severe agi, li metis ŝin en la karbokelon, kaj fermis la pordon. Dum momento, silentadis, sed tiam venis krieto: Malfermigu! malfermigu! kaj Silas liberigis ŝin, dirante: Nu, Eppie, ci neniam ree estos peketema, aŭ ci devos iri en la nigran malbelan karbokelon!

La teksado longatempe ĉesadis tiun ĉi matenon, ĉar nun estis necese lavi kaj vesti Eppie, sed Silas esperis ke tiu ĉi punado havus sufiĉan efikon, kvankam li estus volinta, ke ŝi iom ploru.

Post duona horo, ŝi estis purigita, kaj Silas, turnis la dorson por vidi, ĉu li povus plibonigi la rubandon, sed poste li forĵetis ĝin, pensante ke sendube Eppie estos bona dum la restaĵo de la mateno. Li returnis meti ŝin en ŝian seĝeton apud la teksilo, kiam ŝi lin rigardis kun vizaĵo kaj manoj nigraj, kaj diris: Eppie estas en la karbokelo!

## LA SANKTA FAJRO.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon.).

Por ĉion klarigi mi diros, ke tio ĉi okazis en Jerusalemo.

Je la Sankta Vendredo, la antaŭtago de la ceremonio, kiun mi deziras priskribi, ni vizitis la Preĝejegon de la Sankta Tombo, kie ni vidis kelkajn tre strangajn preparojn.

Apud kolono oni estis etendinta kelke da tapiŝetoj kaj kapkusenoj sur kiuj kuŝas virinoj kaj geinfanoj, kies la viroj staras apude.

Unu el la virinoj dormas; la aliaj nin rigardas per ŝajno de senvigla miro; preskaŭ mi diris, de *bovina* miro!

Sed la geinfanoj! Sur ĉiu vizaĝo estas ŝajno kvazaŭ ili tiom da mirindaĵoj estas vindintaj, ke neeble estus ilin ankoraŭ mirigi pri ia ajn afero.

\* \* \* \* \*

Kio do estas la Sankta Fajro!

Estas miraklo! Jes, por tri kvaronoj el la rigardantoj estas vera miraklo!

Dum tiu ĉi Sabato la Savinto kuŝis en la Tombo, kaj ĉiujare (tiel ili kredas) la fajro malsupreniras en la Tombon el la ĉielo.

\* \* \* \* \*

"*Ne-harak-said.*" Mi ekrigardas!

Enirante en la hotelon estas soldato Turka. Sur la kapo li portas ruĝan Tarbuŝ'on aŭ fez'on; sur la korpo bluan vestonzuavan, sur la kruroj bluan (sed pli palan bluan) pantalonon, kies la supro estas larĝa kiel sako, kaj la malsupro tre prema ĉirkaŭ la maleoloj. Botoj pezegaj vestas liajn piedojn kaj larĝa zono lian talion. Ĉe lia flanko svingetas kurba glavo, kaj tra la zono li estas trapasinta aron da pistoloj kaj ponardoj.

Sed tio, kion mi plej rimarkas, estas grandan pezegan Bastonegon, kiun li tenas per la dekstra mano. Ĝia akra pinto kaj ĝia supro, kiu etendis sin ĉiu flanke laŭ formo de sigelilo estas farita el blanka metalo (kredoble ŝtalo) kaj brilis kiel arĝento.

Mi redonas la saluton kaj venigas la Dragoman'on (gvidiston kaj tradukiston), laŭ kies konsilo ni singarde malaperigas niajn poŝhorloĝojn kaj valoraĵojn.

Tiam per sonora frapo de sia Bastonego la soldato donas al ni la signalon de foriro; tiun ĉi frapadon li daŭrigas la tutan vojon, en longaj balancoj svingante la Bastonegon, kaj ĉiam frapante la teron per la sama sonora frapo.

La hotelo staras ekster la muroj, tial ĝis la pordego al *Joppa* (per kiu ni eniras la urbon) tre

facila estas la irado. Tie ĉi la amaso fariĝas multe pli densa.

Ni trapasas tra la *Strato de David* kaj eniras en *Kristanan Straton*.

Nun ni ekvidas la utilon de la Bastonego; ĝia akra pinto, potence minacante la sandalvestatajn piedojn de la amasegataj popoloj, malfermas al ni, por la momento, liberan vojon. Tamen nia irado estas laŭ maniero de ŝipo, tra maro de malbonherboj.

Tiel ni alvenas al la placeto antaŭ la pordego de la Preĝejego, kie de ĉiufanko la amaso *ondegas* kontraŭ nin; grandaj barbaj, nelavitaj vizaĝoj kun esprimo miksita el mallerteco kaj kredemego; virinoj, malgrandaj geinfanoj; ĉiu el ili havas sian specialan odoron. Multe da fojoj ili separas nin de nia gvidanto, sed la Bastonego havas ankoraŭ aŭtoritaton kvankam neeble estas ĝin svingigi. Certe ĝi daŭrigas la frapadon, sed nur post longaj intertempoj, kaj preskaŭ en tiun saman lokon ĝi frapas la teron el kiu ĝi levigas antaŭ kiom da tempo?

Tre malrapide ni antaŭeniras, sed ni antaŭeniras, kaj nun ni eniras en la Preĝejegon. Pli kaj pli densiĝis la amasego. Baldaŭ la gvidanto mem estas haltigita.

Aliaj soldatoj per Bastonegoj frapadas; inter tiuj ĉi kaj la nia fariĝas interparolado. Tro densa la amasego! Estas neeble ĝin trapasi en tiun direkton. Malantaŭen ni komencas nin tordi, kiel hundo sin tordas el kuniklujo. Baldaŭ ni nin turnas dekstren, kaj iom post iom alvenas al la rando de la amasego. Ni trapasas malgrandan pordon kaj eniras monaĥejon, kie troviĝas nur kelkaj monaĥoj. Kia kontrasto!

Tiel tra ĉambroj, tra trairejoj, suprenirante ŝtuparojn, ĉiam suprenirante ni fine alvenis al unu el la galerioj de la Preĝejego.

Pli ĝuste diri ni alvenis al unu sekcio de la galerio, ĉar ĝi estas divida en sekcioj enhavantaj po sep aŭ ok arkojn per bariloj fermataj.

Ni trovas nin en la Rotundo mem kaj vidas malsupren la Sanktan Tombon (t.e., la konstruaĵon kiu enhavas la Tombon), kaj ni ankaŭ vidas grandan porcion de la amasego da popoloj, kiun ni ĵus estas trapasintaj.

En ĉiu sekcio de nia galerio troviĝas grandan homaron, kaj pli alte mi vidas alian galerion tute per virinoj amasigata.

Ĉie oni rapidas la preparojn; ĉie mi vidas

kandelojn, sed kompeneble ne ankoraŭ ekbruligitajn. El tiu vasta amasego preskaŭ neniu estas, kiu ne tenas unu kandelon, eble eĉ du.

El la galerio de virinoj Greka pastro per ŝnuro mallevas aron da ili.

Nun oni komencas malaperigi la lumojn. Pli kaj pli la Preĝejo fariĝas malluma. Nur murmureto de atendeco sin levis el tiu grandega amasego.

Tiam:—Sonradegon de sonoriloj. Monaĥo post monaĥo elsaltas el malfermaĵo en la konstruaĵo, kiu enhavas la Sanktan Tombon, kaj rapidas supren sur ĝia eksteraĵo. Ĉiu el ili triumfe svingas brulantan kandelon. Ĉie kaj ĉie komencas ekbruligi la kandeloj.

En la galerio de virinoj mano post mano la monaĥo tiras antaŭen sian ŝnuron; ĉe ĉiu ekskuo svingiĝas en hemirondo la aro de nun ekbruligitaj kandeloj kaj ĉiuflanke disĵetas sian sebon sur la amasigatan homaron.

Al la barilo ĝi alvenas. Aponaŭ li ekprenas ĝin, kiam pli ol dudek kandeloj estas al li puŝegataj, kaj de li ekbruligataj.

De tiuj aliaj, kaj de tiuj ankoraŭ aliaj. Ĉiuflanke oni elsendas la lumon en la plejproksiman sektion, kaj en unu momento oni vidas tutan brilegantan rondon. Tiel brilas la tuta Rotundo, tiel la flankaj. Ĉie oni vidas la brulantajn kandelojn ĝoje agitatajn; kaj la voĉoj sin levas, kiel la sono de la marbordo, kiam koleraĵo ondegas brulege rulas la stonetojn.

Kaj nun procesio de la pastraro rondiras la Tombon; procesio kiun la premeĝo de la popolo ĉiu minute *ĉifas* kiel knabeto ĉifus paperon.

Sed jam tro longa la priskribo! *Du* soldatojn ni trovas ĉe la reveno. Kial *du*? mi pensas, ĉar la Preĝejo kiam ni ĝin reeniras estas kompare senhoma. Malgrandan knabon mi rimarkas, kiu tenas per ĉiu mano brulantan kandelon, kaj per siaj grandaj okuloj nin rigardas. Plene li kredas, ke la *Sankta Fajro* ne povas bruligi la homan korpon. Tion kredas, kredeble, preskaŭ la tuta pilgrimaro!

Elirante el la Preĝejo ni tuj ekvidis kial la *du* soldatoj.

Ŝajnas kvazaŭ la tuta amasego estas forlasinta la Preĝejon je la sama momento; el kiu aro ĉiu ero treege penegas sin puŝi antaŭ sian proksimulon.

La Bastonegoj perdas nun sian aŭtoritaton. Pro manko de spaco neeble estas ilin movi; tial la frapado ĉesas.

Forte puŝegas per la ŝultroj niaj du soldatoj, kaj, ĉar ili ne sole reprezentas aŭtoritaton sed ankaŭ estas ambaŭ fortuloj, ili sukcesas malfermi vojon por *si mem*.

Sed ne por ni!

Ĉi tie ni supreniras tiujn malaltajn ŝtupetojn el kiuj konsistas plej ofte orienta strato.

Sur la ŝtupetoj kiel amasego!

Oni kredas ke ju pli longe brulas la kandelado des pli longe daŭros la feliĉeco de la venonta jaro; tial ni vidas virinojn per la manoj malfacilege ŝirmantaj la ankoraŭ brulantajn kandelojn; homojn ni vidas el ĉiu raso, kaj bone ni scias ke tie ankaŭ troviĝas ĝeifanoj. Foje, eble mi tion imagis, ŝajnas al mi ke mi aŭdas la ekkrion: "*Leprulo*."

Gutoj de akvo, ni estas dispelataj per ĉiu ondolinio de la homa Oceano.

Malproksimiĝantaj mi vidas la gvidantojn. Fortege batalantaj ili ĉiam supreniras. Subite ili haltas. Unu el ili tie restas por gardi la pozicion, la alia revenas nin serĉi.

Ha! tiu vojirado, tiu terursonĝa progresado! Tirataj, premeĝataj, puŝataj, ni alvenas al kelkaj malgrandaj kolonetoj, kiuj iom baretis la vojon.

Ĉi tie la premeĝo fariĝas teruriga. Iu nekonata sin savas de subpremo per la piedoj ĉirkaŭprenante miu.

Bonega ideo! Mi fariĝas samideano! Miaflanke mi ĉirkaŭprenas la talion de la pli forta el la du soldatoj, kaj (mi malsatas ĝin diri sed ĝi estas la vero) en tiu malnobla maniero mi estas eltirita el la Turniĝado de la *Sankta Fajro*!

*En jaro 1834a pli ol 6,000 personoj estis en la Preĝejo.*

*Okazita Tumulto, la soldatoj Turkaj mortigis pli ol 300 pilgrimojn.*

## VINTRA DOLĈECO.

Originale verkita de Rene Deshays.

Malsupren mi rampis, tra grizaj branĉetoj;  
Indulga Decembro la teron mologis:  
Jen mi nun ekvidas la verdan riveron,  
Kaj grizajn arbojn sur kruto kontraŭa.  
Ne larĝa la fluo, la montoj malgrandaj,

Kaj paca l'aero, kaj pala la suno;  
Mallaŭta kaskado revige parolas,  
Dormetas la herboj ĉe l'akvo lulanta.  
Mi sekvis la kurban valetan paŝeton:  
Ĉi tie bon' estas memori l'amikojn.

## VIRSEKSA LOGIKO KAJ VIRINA INSTINKTO.

Originale verkita de Ben Elmy.

Mi memoras, ke antaŭ multe da jaroj, dum mi estis nur juna knabo, mi ofte aŭdis kaj legis, ke ekzistas natura kaj nepasebla diferenco inter la rezonado de la viro kaj tiu de la virino. Oni pretendadis, ke la virino reguligas siajn agojn kaj konduton nur laŭ fantazio aŭ instinkto; kontraŭe la viro, oni diris, aŭskultas kaj obeas la severajn diktojn de prudento kaj de logiko—precipe de logiko.

Tiu ĉi pretendo tre konfuzis miajn fruajn konjektojn pri tiu mistera logiko; ĉar, infane, mi ekpenis difini ĉiun agon virinan kiel instinkta, kaj ĉiun viran pensadon kiel logika. Sed iafaje la sekvoj de tia juĝo estis embarasaj; tiom por alioj, kiom por mi mem.

Ekzemple; serĉante kelkafoje la solvon de ia grava infana pensado, kaj alvokante mian patrinon por informo, tiu kara patrino kutimadis diri, "Demandu ĝin al patro via!" Tion farante, mi tamen ricevis de la patro, por tuta respondo: "Ne enuu min, petulo!"

Tia konduto ŝajnis al mi vera enigmo. Ĉe la juneco de la patrino ne ankoraŭ ekzistis kolegio de Newnham aŭ Girton; mi, do ne trovis mallaudinda ŝian nescion; sed la patro estis ĝuinta ĉiujn utilojn universitatajn, kaj tamen lia "logika" agado ne pli helpis la infanon, ol la agado sole "instinkta" de la patrino!

Okazis multe da tiaj disrevidoĝoj, kaj ne sole je aferoj spiritaĵoj. Al mia fratino, multe pli maljuna ol mi, la patro severe malpermesis la uzadon de *frisettes* por pligrandigi ŝian kapornamon. Li ankaŭ tre ridadis la *chignon* kiun portis sia propra fratino fraŭlina. Mi sciame eltrovis, ke tiuj virinaj ornamoj estas fabrikitaĵoj el ĉevalharegoj, kaj mi konkludis, ke ia stranga influo de instinkto virina estas kaŭzo de tiel malbela praktiko, kiu juste meritas cenzuron de la virseksa inteligenteco logika.

Tamen, irante post nelonge en juĝejon kun mia patro, mi tre miris, vidante pli ol dudek advokatojn kies ĉiu portis sur kapo tiom da ĉevalharego kiom sufiĉus por fari ses au sep frizaĝojn, kaj ankaŭ grandegan "chignon." La juĝisto mem, kiun mi supozis la plej instruita kaj logika el ĉiuj, ankaŭ portis la plej grandan kvanton da ĉevalharego. Aliparte mi memoras, ke la vetero estis varmega, kaj mi tre ĝojigis, ke mi mem ne portis eĉ ĉapon sur kapo mia; dume nek la juĝisto nek ia advokato demetis siajn ŝvitajn perukojn.

Sed mia patro multe kolerigis kiam mi rakontis al la supredirita onklino Maringo, ĉion kion mi rimarkis en juĝejo. Mi do serĉadis ĉu tiu kolero

estas vere rezultato de virseksa logiko, aŭ eble nur simptomo de virseksa nelogika petoleco, neniel pli nobla ol ia virina eco.

Iom post iom mi komencis dubi, ĉu ekzistas efektive tiu ĉi pretendita diverseco de motivo aŭ de rezonometodo en la agado de la du seksoj. Ĉar, apud tiama tempo, oni min kondukis al parado de soldatoj en Hyde Park. Inter aliaj aferoj mi tuj observis kiel eksterorde dikaj estis la brustoj de la soldatoj. Timante ian koleron de la patro, mi ne kuraĝis lin paroli pri tio ĉi; sed la onklino Manjo ĉiam estis simpatia, tiam mi eksciigis al ŝi mian naivan sciemon.

"Ha, jes," diris ŝi, "la soldatoj estas vatitaj." "Kio tio estas?" mi demandis. "Nu," ŝi respondis, "soldato portas artan vestplibonaĵon, tute same kiel sinjorino, nur en alia parto de la vestaĵo. La soldato ĝin portas, kudritan al la brusto de sia frako!"

Tiam mi rakontis al ŝi pluan okazaĵon. La paradtago estis blovega, kaj la vento faligis la ĉapelon de unu el la generaloj, kaj ĝiaj plumoj iom tordiĝis. Milita servisto eklevis la ĉapelon, kaj alportis ĝin al la generalo, kiu kolere signalis per la fingro, ke estas unu plumo rompita kaj elstaranta. La servisto dolĉe eltiras la kulpan plumon, plibonigas la tutan ĉapelon, tiel lerte kiel ĉambristino de sinjorino, kaj la generala moŝtofine trankviligas.

Tion aŭdante mia onklino ekridetis, kaj diris, ke kelkafoje milita fajrmanganto zorgas pri sia ekstera vidigo, tute tiel nerve kaj precize kiel sinjorino la plej fasonema. Ŝi ne diris ĉu tio estas pruvo efektiva de "logiko virseksa."

La tempo pasadis, kaj mi vizitis por la unua fojo la Ĉambron de Deputatoj (*House of Commons*), kie okazis longa kaj teda parolado, per tiama famega politikisto. Jam tre ofte estis rakontita al mi, ke la virina elokventeco estas rimarkinda pro trolongeco kaj nekonsekvenco, kun granda manko da logiko. Tamen, je tiuj ĉi specialaj ecoj, la parolado de tiu politikisto estis kiel eble plej "virina."

Mi brave kuraĝis avizigi tion al mia patro, kiu, tiun ĉi fojon, feliĉe, aprobis mian juĝon. Li eĉ diris, ke li mem preferus pli la babiladon de kiu ajn maljunulino, ol aŭskulti la sensencaĵojn de tia politikisto. Sed mi tiam ekmemoris, ke mia patro ne estis de sama politiko kun tiu oratoro; kaj denove mi demandis min, ĉu la patraj vortoj estas vere rezultato de virseksa logiko, aŭ nur de propra lia fantazio.

Antaŭ nelonge virsekse egoismo aŭ blindeco malpermesis al virino la utilojn de plena edukiteco. Oni diris, ke la virinoj ne havas sufiĉan cerbkapablon por atingi kaj profiti je la viraj studoj—la matematiko, la sciencoj fizikaj, k.t.p. Ni nunuloj klare kaj ĝoje vidas kiel erarega estas tiel supozo.

Sed mi devas ĉesigi mian plendon. En nunaj tagoj ni bone vidas, ke ne ekzistas la pretendita fatala diferenco de cerbkapableco inter la du

seksoj, sed ke tio ĉi estas nur afero de edukiteco kaj ekzercado. Baldaŭ, sendube, ni ĉiuj rekonos, ke la viro mankas la helpon de la virino ankaŭ ĉe la aferoj leĝigantaj, koncernantaj la feliĉon de la tuta homaro; kaj ni ĝojos je la neniigo de la malsaĝa disputo, ĉu viro aŭ ĉu virino havas la ecojn la plej necesajn kaj profitajn por efektiviĝi la progreson de ĉiam pliboniĝonta komuna homa raso.

## LA NASKIĜEJO.

Originale verkita de Paul Mathews, M.A.

Ĉie mi amas la kamparon sed, ho! ĉarma naskiĝejo mia, kiom mi vin amegas! Ĉu vi, karaj legantoj, konas tiun belan loketon? malgrandan vilaĝeton, kiun trapasas nenia vojego, nur unu mallarĝa strato, en kiun kaj el kiu kondukas malgranda vojo, ĉe kies ĉiu flanko vidigas allogantaj vojetoj tra kampoj kaj arbaretoj.

Proksime preterfluas nobla rivero, portanta sur sia trankvila akvo brunvelajn, malrapide movigatajn ŝarĝbarkojn. Cetere, la floroj: vintrafine la *neĝagutetoj* (Galantoj) pli malfrue la *primoloj*, frusomere la *bluaj sonoriloj* (Kampanuloj), plensomere la *bovokuloj* (Lekantoj). Kaj plie la birdoj. Kiu povas senĝoje aŭskulti la kantojn de la alaŭdoj, de la *nigrabirdoj* (merloj), de la makulitaj turdoj, de la ruĝabrustoj aŭ, apud la rivero, de la kanasilvioj, kiu dolĉe kantetadas?

Ofte, tra la foliaro super rivereto, oni povas vidi la gajekoloritan *refaĝiŝkaptiston* (Alciono). Kian plezuron donas la zumado de la abeloj, la flugeto de la papilioj, kaj la multaj aliaj kamparaj vidaĵoj! La vintro mem ne estas laciga, la nudigitaj arboj, la neĝo, posedas siajn proprajn belaĵojn por ĉiu, kiu vere amas la Naturon.

Tie mi de longe naskiĝis; el tie mi de longe estas apartigita.

Lastan Paskan London, la unuan fojon dum tridek kvin jaroj, mi tien revenis.

En la daŭro de tiuj tridek kvin jaroj mi edziĝis, alvenis al mi familieto, tri karaj infanoj, la plena ĝuado de facila feliĉeco. Sed ĉiam mi estis deziranta reviziti la malnovan vilaĝeton, ofte mi estis sopiranta je la scenoj kaj la amikoj de mia infaneco.

En la dirita tago mi, tute sola, faris mian sentimentalajn vojaĝon al la bone memorita vilaĝeto. Eĉ nun oni devas marŝi kvin mejlojn de la plej proksima stacidomo, ĝis la vojaĝa fino. Je ĉiu paŝo mi preteriris ian amatan loketon, feliĉe ne aliformiĝitan. Malrapide mi marŝadis, dolĉe pensante pri la tagoj de mia juneco, redirante al mi la nomojn de miaj antaŭaj kunludantoj.

Ĉu ĉiuj estas ankoraŭ vivantaj? Ne estas eble; unu el ili, la plej ĉarma el ĉiuj, la malgranda Suzio—. Ho ve! feliĉa tempo pasinta!—

Mi eklevas la okulojn—Kio estas? ĉu mi sonĝas? Mi ŝin revidas, la saman, la karan Suzion!

Mi forgesas edzinon, infanojn, mi denove knabiĝas: tie staras mia kara kunludantino!

Mi kuras renkonte al ŝi elkriante "Sunjo! Sunjo!" La infano rigardas min terurite. Kial? Ĉu ni ne plu estas amikoj? Ha! Mi memoras; mi estas maljunulo, kompare je tiu ĉi knabineto! Ŝi ne estas mia Suzio "Venu tien ĉi, kara mia" mi aminde diris, "Ĉu mi vin timigis? Diru al mi—."

Ŝi min ĉesigis, demandante: "Kiel vi konis mian nomon?" "Mi rekonis vin, karulineto, tio estas longa rakonto. Diru al mi, kie loĝas la patrino, mi deziras viziti ŝin."

"Tie," ŝi respondis, per la fingro montrante beletan dometon meze en malgranda ĝardeno.

Ni tien kune iris. Alproksimiĝinte al la pordo la infano ekkriis "Patrineto, Patrineto, venu: Sinjorego por viziti vin!" La pordo malfermiĝis: Jes, mi estas certa, la patrino estas la vera Suzio! Mi etendas la manon. "Sunjo!"—Ŝi min long daŭre rigardis—"Tomaĉjo!" kaj ni kisis unu la alian.

"Eniru, eniru, vi estas bonvena! Edzo! jen estas Sinjoro Tomaso, kiun ci bone memoras."

La edzo estas alia bone memorata kunludinto. Ho! ĉarmegaj horoj, kiujn mi pasigis kune kun tiuj ĉi simpluloj, kiuj ja trovis veran plezuron min revidante. "Eble," ili diris al mi, "oni ne vin sciigis, ke via antaŭa loĝejo estas aĉetebla?"

Tion ĉi mi ne estis aŭdinta. Post kelke da tagoj mi ĝin aĉetis.

Baldaŭ mi alkondukos mian familieton por vivadi en mia amegata naskiĝejo.

Tie mi esperas ke mi finos mian teran migradon.

[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 6266.]

(Vidu la sep antaŭajn Nrojn.)

## AKTO I.

## SCENO 2 (daŭrigo).

- PROSPERO.— Ne, knabino;  
Ĝi manĝas, dormas, sentojn ankaŭ  
havas  
Simile je ni. Tiu ĉi junulo  
En ŝippeero estis: pro ĉagreno  
Li markojn portas kiuj malbeligas  
Vizaĝon lian—vi, alie, povus  
Nobelon en li vidi. Li, perdinte  
Parencojn siajn, vage ilin serĉas.
- MIRANDO.— Estaĵo dia povus mi lin nomi,  
Ĉar mi neniam vidis tiel nobla!
- PROSPERO (*flanken*).—L'afero venas laŭ deziro mia:  
Ĉi tio Arielon liberigos  
Nur post du tagoj—
- FERDINANDO (*ekvidante Mirandon*).—La diino  
Muzike ĵus laŭdita! . . . Mi petegas,  
Bonvolu diri al mi ĉu vi loĝas  
En tiu ĉi insulo; ĉu vi povus  
Konsilojn bonajn al mi doni;  
Sed, mirindaĵo! scii mi deziras  
Ĉu estas vi fraŭlino.
- MIRANDO.— Mi, sinjoro,  
Ne mirindaĵo estas, sed fraŭlino.
- FERDINANDO.—Ĉielo! mian lingvon! Mi ja estus  
El ĝiaj parolantoj la plej alta  
Se hejme nun mi starus.
- PROSPERO.— La plej alta?  
Se l'Neapola reĝo tion aŭdus,  
Vi kiu estus?
- FERDINANDO.— Simple la aŭdanto  
De homo parolanta pri la reĝo.  
Ke li min aŭdas tion mi bedaŭras,  
Ĉar estas mi la reĝo: mian patron  
Perei mi ĵus vidis.
- MIRANDO.— Ho, teruro!
- FERDINANDO.—Li dronis, kun sinjoroj, kun Milanaj  
La duko, ankaŭ lia brava filo!
- PROSPERO.—La duko de Milano kaj bravega  
Filino lia povus vin komandi  
Se dece estus. (*Flanken*) La du  
gejunuloj  
Intervidante tremis kaj ruĝiĝis . . .  
Nun Arielo baldaŭ liberigos.  
(*Al Ferdinando*) Al vi, sinjor', mi vorton volus  
diri:  
Mi timas ke vi multe ĵus eraris.
- MIRANDO.— Ĝentile kial patro ne parolis?  
De mi vidita estas homo tria  
Ĉi tiu, sed kortuŝa la unua.  
Kompato same movu mian patron!
- FERDINANDO.—Fraŭlino, se vi estas korlibera,  
Reĝino Neapola vin mi faros.
- PROSPERO.—Sinjoro, al vi tuj mi diros haltu!  
(*Flanken*) Nu! ili estas intersimpatiaj:  
L'aferon mi ne volas rapidigi;  
Nenion tro facilan oni ŝatas.  
(*Al Ferdinando*) Atentu, aŭdu, ĉar mi vin  
kulpigas  
Uzurpi ies nomon ne la vian:  
Spiono eble vi ĉi tie staras  
Por poste ŝteli de mi la insulon.
- FERDINANDO.—Ne! per honoro mia!
- MIRANDO.— Malhonoro  
Neniam loĝis en sanktejo tia;  
Ĉar se malbonon tia dom' entenus,  
Eĉ bono volus loĝi kun ĝi.
- PROSPERO (*al Ferdinando*).— Venu!  
(*Al Mirando*) Por la spiono ne parolu. (*Al  
Ferdinando*) Venu!
- Piede, kole, mi vin kunkatenos,  
Marakvon trinkos vi, via nutraĵo  
Konsistos el mituloj riveretaj,  
Radikoj sekiĝitaj, kaj glanseloj—  
Nu, venu!
- FERDINANDO.— Ne! mi tuj kontraŭbatalos  
Tielan agon, ĝis la malamiko  
Pli pova montros sin. [*Eltiras sian  
glavon, sed tuj magie, ne povas movi.*]
- MIRANDO.— Ho, kara patro!  
Tro ne ofendu lin, ĉar, dolĉanima,  
Li maltimulo estas.
- PROSPERO (*al Mirando*).— Knabineto,  
Ĉu vi al mi konsilus? (*Al Ferdinando*)  
Glavingigu,  
Ho, perfidulo, kiu ŝajni volus  
Sed ne maltimas frapi, tiel kulpo  
Tremigas vin! Plu ne kontraŭbatalu:  
Bastono mia tuj vin senarmigos.
- MIRANDO.— Mi vin petegas, patro—
- PROSPERO (*al Mirando*).— Vi foriru!  
Ne tuŝu mian veston.
- MIRANDO.— Ho! kompatu:  
Por li mi garantiulino estos.  
(*Daŭrigota*).

## LA REVENO AL LA MONTARA PATRUJO.

Originale verkita de Clarence Bicknell.

De miaj montoj patrujanaj, jen, fine, la revido !  
Post longaj jaroj en la urboj, malgaje, eĉ sen rido ;  
Aŭ kie l'ebenaĵo griza senlime sin etendas,  
Kaj, aŭ pro tim' aŭ hont', nenio la bluĉielon fendas.  
Ho ĝoj' ! l'aeron tiel puran libere respiradi,  
Kaj ĉe la montoj Dibenitaj en dolĉa pac' restadi !

Ne plu la bruo de l'amaso, la krioj en la stratoj,  
Mizero ĉie kaj malsano, blasfem', batigoj, batoj ;  
Ne plu la polvo ĉe l'vizaĝo, la fulgo en aero ;  
Ne plu herbejoj sekigitaj, kaj neflorada tero ;  
Sed ĉie arboj kaj arbaroj kun kampoj milkoloraj,  
De fojno riĉa kaj brileta per herboj bonodoraj.

El supro de la blankaj pintoj, la hejm' de l'Monta  
Reĝo,

Mantelo kies senmakula estas l'eterna neĝo,  
Riveroj, riveretoj, kuras, portante vivobenojn,  
Kaj, trapaŝante, ĉie faras fruktejojn ĝardenojn,  
La branĉojn ili, ĉe la bordoj, de l'rozabet balancas ;  
Bovinoj blekas, birdoj pepas, kaj papilioj dancas.

La tutan tagon laboremaj abeloj laŭte zumas,  
Serĉante florojn kiujn ili per kisoj amindumas.  
Kaj kiel bela la floreto ! l'azuraj ĝentianoj,  
Kun alporozoj, orlilioj, kaj dolĉaj timianoj !  
Mi aŭdas la naturmuzikon de l'blanka akvofalo,  
Kaj la kantetojn de l'paŝtistoj tra l'ĉoiga valo.

Mi mem nun povas ree kanti la kantojn de juneco,  
Pri la natur', pri la patrujo, pri amo kaj beleco.  
La pensoj, kiel agloj, flugas, nek plu sur tero haltas ;  
La koro, eĉ la membroj miaj, kiel la ĉamo saltas.  
Parolis urboj, ebenaĵo, pri larmoj kaj pri morto,  
Sed nun pleniga ĉio estas je vivo kaj je forto.

Forteco al ŝtoneg' simile de l'nemoveblaj montoj,  
La vivo kiel la forfluo el senĉesantaj fontoj.  
Ho ! kiel bone kun naturo la vivo de simpleco,  
Per kiu venas tiuj benoj de sano kaj forto !  
Mi malproksimen ne plu vagos, sed estu mia sorto.  
En mia paca monta hejmo restadi ĝis la morto.

## LA MALSANA LEONO.

Leono, pro maljuneco kaj malforteco, ne povis plu ĉase trafi sian kaptaĵon, tial li sin kuŝigis en sia kaverno, kaj, per mallaŭta voĉo, anoncis, ke li estis tre malsana. La raporto baldaŭ disvastiĝas inter la bestaro, kaj kaŭzas grandegan plorindon pri la reĝa malsanulo. Unu post la alia venas por lin viziti, sed, ĉar ĉiu malkune, kaj en la propran leonan kavernon eniras, la leono facile povas fari kaptaĵon el la vizitantoj, kaj grasiĝas per tia dieto. Vulpo, kiu suspektis la tutan aferon, fine venas por informiĝi pri la leona saneco, sed, staras malproksime kaj demandas "Kiel la Reĝa Moŝto sanas ?"

"Ha, karega amiko mia," diris la leono, "ĉu estas vi ? Kial do vi tiel forstaras de mi ? Venu, dolĉemulo, ŝutu konsolan vorton en la oreton de malfeliĉa leono, kiu nur tre mallonge vivos !"  
"Vin benu la dioj !" respondis la vulpo.  
"Pardonu se mi ne povos resti pli longe ; sed verdire, min tre maltrankviligas la piedsignoj, kiujn mi tie ĉi ekvidas ; ĉiu el ili ŝajnas eniri vian kavernon, sed neniam eksteren deiri."

*Ne risku iri tien, kien multuloj eniras, sed neniu deiras.*

(6266).

## PATRINO KAJ INFANO.

Flandra poeziado de Frans de Cort.

Kiam mi plezurege rigardas mian rozkoloran infanon, kaj tiun, kiu donacis lin al mi, mian amegatan edzinon, tiam ne demandu kiun el ili mia koro plej amas. Mia koro ne povas disigi la patrino de la infano. Mi etendas la brakojn,

kaj ĉirkaŭprenas miajn gekarulojn kune inter ili, kaj ĝojlarmoj fluas sur miajn vangojn. Ha ! Se vi scius, mallaŭte mi diras, kiel vi estas amataj, vi, infano, pro via patrino ; kaj vi, patrino, pro via infano !

Tradukita de EUG. MATHYS, filo.

## CORRESPONDENCE NOTES.

The Hon. Sec. of the London Esperanto Club herewith gives notice that the Free Classes are now closed for the summer months. Due notice will be given of the date of re-opening. In the meantime inquirers can obtain information from Miss Schafer, 8, Gloucester Crescent, Regent's Park, N.W. (Stamps should always be enclosed for the reply).

Club Members who have not yet renewed their subscription, and whose number is below 136, are also reminded that their renewals have fallen due. It is earnestly hoped that they will favour the Club with a continuance of their kind support.

Our prized volume, the *Fundamenta Krestomatio*, bears a most unfortunate title.

Many correspondents ask the derivation of the word. We suppose it has been imported from the Greek, and means the Giver of Oracles. Perhaps the Second Edition of this great work will bear some more easily recognised title, which may serve to apprise the uninitiated of the purpose and scope of the volume.

The note in our last issue concerning the *Method of telling the time in Esperantoland* has called forth an admirable suggestion: That everywhere the

example of railway time-tables should be followed. This is already international, and thus no confusion could arise. Kvin dekdu, 5.12, dek kvardek, 10.40, etc., will enable us to keep our appointments with punctuality.

We have done our best to buy in copies of the *First Number* of THE ESPERANTIST, with the very unsatisfactory result that there are now to be had only six clean copies at 2/6 each.

Our infant growth, though rapid, has not yet warranted the establishment of a Standard Examination in Esperanto, for the awarding of an *Atesto de Kapableco*. Those desirous of obtaining this must therefore still do so under the auspices of the French Society.

Nevertheless, it is to be hoped that, ere long, we also may be able to issue British Certificates of Merit.

As so many Esperantists are occupied in the City, it has been proposed that a monthly meeting might be arranged over some convenient lunch or tea table. Will those *Gesamideanoj* able and willing to fall in with the proposal kindly communicate with the Editor to that effect?

## INSTINKTO aŭ INTELIGENTECO.

Dua Vera Rakonto de O.W. 7074.

Mi legas en la dua numero de la *Internacia Scienca Revuo* la titolon de artikolo publikigita en la *Revue Scientifique*. Jen la teksto: *E. Mancini. Aritmetiko de la Bestoj. Raporto pri kelkaj observoj kiuj pruvas, ke la bestoj povas havi malgrandan ideon de la nombro.*

Tiu titolo rememorigas al mi strangan fakton, kiun mi okulvidis, kiu en la momento tre ridigis min kaj kiu, poste, pripensigis min; mi estis devigita kredi, ke iaj bestoj povas kalkuli.

Cetera vi povos tion juĝi, mi tuj rakontos al vi la fakton.

En la ĉirkaŭaĵo de Montmouillon en la Departamento La Vienne en Francujo, unu el miaj onkloj posedas bienon. Tie la gefarmamastroj kaj liaj infanoj zorgas pri ĝi. Ili edukas en ĝi la kutimajn bestojn, bovojn, ŝafojn, porkojn, k. t. p.

Ĉiutage, kiam la vetero ne tion malebligis, oni elirigas la bestojn el la staloj, kaj oni alkondukas ilin sur la kampojn, kie ili sin paŝtas. Kiam baldaŭ eknoktiĝos, oni rekondukas ilin al la staloj.

Ian tagon mi estis alirinta kun mia edzino kaj mia filino por viziti niajn geonklojn.

En la tagmezo, ni aliris al la farmabieno. Mi promenis kaj alvenis sur la kampo, kie estas porkino kun sia idaro, dek kvar porkidoj; mi ripetis, dek kvar.

Estis la momento por revenigi la bestojn al la stalo. La gardistino, per vergeto ilin realkondukis. Kiam la pordo de la stalo estis malfermita, la porkidoj eniris la unuajn, poste eniris la patrino. Sed, post kelkaj sekundoj, oni aŭdis blekegojn terurajn, kaj batojn sur la pordo. Tuj la gardistino malfermis ĝin, kaj, puŝegante la servistinon, la porkino forkuris al la kampo. Ni tuj tre miris, kredante, ke la porkino fariĝas freneza. Mi sekvis ĝin kaj vidis ke ĝi eniris arbetaĵon, en kiu restis unu el ŝiaj idoj. La patrino forpelis ĝin, puŝante ĝin per sia nazego, blekegante. Ili ambaŭ reeniris la stalon trankvile kaj la porkino silentis.

La konkludo de tiu vera rakonto estas tute logika: la porkino sciis ke ĝi havis dek kvar idojn. Kiam ĝi ilin kalkulis, ĝi ekvidis, ke ili ĉiuj ne estis kune kun ĝi, kaj ĝi forkuris por serĉi la forestantan. Mi ne povas nekredi ke tiu porkino sciis kalkuli.

Ĉu vi ne pensas kiel mi?



## GALA SKIZETO.

Originale verkita de E. W.

*Mi naskiĝis en la jaro 1825, kaj jen la jaro 1904! Mi do kredas, ke mi ne estas tro juna por senpeke permesi al mi iom da libertempo, en kiu aminde memori la ĝeamikojn de mia infaneco kaj juneco.*

*Kiam mi parolas pri miaj karaj gesamlandanoj al miaj nunaj konatuloj, ili ĉiam diras: "Kial vi ne skribas libron? Viaj rakontoj estas tiel interesaj."*

*Mi ĉiam respondis: "Tro multaj jam estas la libroj; kiu povas ilin tralegi?"*

*Tamen, en la lingvo internacia ne ankoraŭ estas multe da libroj, kaj baldaŭ multaj estos la legantoj. Mi diras "baldaŭ," ĉar tiu ĉi lingvo estas treege facila. Post unu semajno mi povis mem ĝin kompreni, studinte apenaŭ dek kvin minutojn ĉiutage, kaj mia memoro tamen multe malfortiĝis.*

*Mi pensas, ke kelkaj simplaj skizoj de la Galanoj antaŭ du generacioj eble povos interesi la kosmopolitan legantaron de THE ESPERANTIST.*

*Pro tio mi verkis tiujn ĉi rakontetojn.—E. W.*

## I.

## PACAMA PASTRO.

Li estis tre granda kaj maldika; lia kapo tiel malalte kurbigis, kaj lia maniero estis tiel timema, ke li ŝajnis esti kvazaŭ fremdulo en sia propra domo. Liaj okuloj ĝrizablaj estis dolĉaj kaj songaj, liaj manoj malgrandaj kaj molaj vibris, kiam oni tuŝis ilin. Tia estis lia voĉo, ke nura *Bonanokto* samtempe estis beno kaj kareso.

Familia tradicio diris, ke li antaŭe estis tiel granda, vira, kaj aktiva, ke la Princo-Reganto (poste George IV.) diris pri li: "Tio ĉi pastro estus fariĝinta la plej belega oficiro de miaj *Grenadier Guards*."

Oni ankaŭ diris, ke, dum juneco, li amis kaj estis amita; sed ke li ne kuraĝiĝis kontraŭstari la malriĉecon. Do, post jaroj de nedecideco, li sin trovis sola.

Lia *Cariad* (Amantino) estis edzino kaj patrino kiam li edziĝis la riĉan vidvinon kiun, dum tridek jaroj, ĝuis lian indulgan bonecon.

Nur unu foje, estante juna kaj fraŭlo, li montris sian karakteron.

Lia paroĥo estis apud la rifa marbordo, kie multaj ŝipoj disrompiĝis. La tieaj homoj, tiel, kiel siaj samrasanoj la Bretoj kaj Gaeloj, kredis, ke la maro estis donaco de Dio, por provizi por ili fajrlignon kaj multajn aliajn trezorojn. Sed ili devus nenion preni, se sin savis unu sola maristo el la pereita ŝipo.

Tiu ĉi leĝo nature ne savigis la maristaron.

La pacama pastro ofte predikis kontraŭ la kruela kutimo igi la ŝippereojn.

Ekstere de la preĝejo, la paroĥanoj ofte diris:

Se ni ne prenos la bonajn Diajn donacojn, aliaj ilin prenos, sed li respondis: Agu prave, kaj eble viaj najbaroj imitos vin.

Fine, post multe da tempo, li demandis: "Ĉu vi ne protektos la maristojn, kaj ilian bienon?"

Baldaŭ sciigis, ke la loĝantoj de Bxxx ne permesos la ŝippereigon sur ilia marbordo kaj ankaŭ, ke la vilaĝanoj de Txxxx kaj Sxxxx decidiĝis agadi laŭvole, kie ajn ili povos.

Terura ventego blovis, kaj ŝipo surkuris sur ŝtonejon.

Tiam okazis ke la loĝantoj de la najbaraj vilaĝoj kunvenis al la loko, portante falĉilojn, stangojn, martelojn, kaj aliajn batalilojn. Kune kun siaj paroĥanoj, la pastro renkontis ilin sur la sablo. Li antaŭeniris, kaj montris al la transpaŝintoj sian pafilon ekkriegante: Se unu el vi provos transiri tiun ĉi mureton, mi pafos!

Juna granda viro, ridante je li, saltis super la barilo. Pafotuj ekaŭdiĝis kaj la junulo tombis sur sia vizaĝo.

Tamen, li nur falis pro timo. La kuglo estis pasinta inter lia brako kaj flanko, kaj nur vundis lian vestmanikon.

Tamen la leciono ne estis senfrukta, ĉar, post tiu ĉi tago oni neniam trovis en tiu ĉi loko ŝipdetruistojn.

La pastro neniam parolis pri la afero: eble la teruro kiun li sentis, kiam li kredis, ke li mortigis homon, estis tro granda por sen akra doloro esti memorita.

Dum multaj jaroj lia vidvino prenis el ĝia kaŝejo, kaj kun fiera plezuro montris, la belan argentaĵon, de Lloyds donacita je dankeco pro la maristoj kaj ŝarĝoj de ŝia edzo savitaj.

(*Dua skizeto aperos en THE ESPERANTIST, No. 9.*)

## DIVERSAJ AVIZOJ.

S<sup>ro</sup> Motteau nun tradukis la tuton de *La Ventego*, kaj oni eldonos la verkon en aparta libro tuj kiam oni ricevis 500 promesojn ĝin aĉeti. Ĝia kosto estos 1f. 50 (1/3 afranke). Post la eldono kosto 1/3.

Cu la Legantoj, kiuj deziras ĝin posedi, skribos al la Redakcio ?

\* \* \*

La C.T.C. (Cyclists' Touring Club) Gazette de Majo enhavas tre valoran leteron de S<sup>ro</sup> Bourlet, kune kun Angla traduko. Estas rimarkinde ke, kvankam tiu letero enhavas 500 vortojn, ne estas bezono por supersignita litero ia! Oni konsilas, ke ĉiuj Esperantistoj ĝin tralegu.

(Specimeno de la Gazeto, 3d., de 47, Victoria Street, Westminster, S.W.).

\* \* \*

S<sup>ro</sup> Metcalfe sendas kelkajn interesajn sciigojn. Li venkis en la Esperanta koresponda ŝakludo kun Belga Samideano, kaj nun komencas duan batalon! Li ankaŭ proponas, ke kelkaj lertaj Esperantistoj kunverku la tradukon de la Nova Testamento. Ĉu tiuj, kiuj deziras kunlaboradi, skribos al S<sup>ro</sup> Metcalfe, ĉe la Redakcio ?

\* \* \*

Ni jam estas vidintaj la unuajn paĝojn de *Alice in Esperantoland*, kaj la verko promesas fariĝi tre interesa kaj valora lernilo. Al la sindonema verkisto salutojn kaj gratulojn!

\* \* \*

KARA SINJORO.—La anonco pri miaj Dimanĉaj Promenadoj sukcesis, ĉar, lastan Dimanĉon, S<sup>ro</sup> Sutcliffe kaj sia filo, S<sup>ro</sup> Rayner, kaj ankaŭ S<sup>ro</sup> Farnes, kunigis ĉe Bromley. Ni paroladis Esperante la tutan tagon, kvazaŭ en Esperantujo, kaj faris multe da progreso pri interparolarto.

Fidele via,

C. W. T. REEVE,

63, Effingham Road, Lee, Kent.

\* \* \*

Niaj Germanaj amikoj tre rapide antaŭeniras. Ni ĵus ricevis de S<sup>ro</sup> Borel, 95, *Prinzenstrasse, Berlin*, du novajn verkojn de la *Kolekto Aprobata*. (1). *Vollständiges Lehrbuch der Esperanto Sprache, mit Übungen, Syntax und Proben aus Poesie und Prosa, nach Prof. Carl, bearbeitet und erweitert von J. Borel. Kosto 1/3 (1 mark 20)*. (2). *Wörterbuch Deutsch-Esperanto, unter Redaktion von Dr. Samen Hof, herausgegeben von Hermann Jurgensen und M. Pagnier. 2/- (2 mark)*.

Ankaŭ ni danke ricevis. (1). *Cours Elementaire d'Espéranto, par E. Deligny, Professeur au Groupe Espérantiste de Saint Omer*. (Bona 53 paĝa verko). (2). *Sondilo Skrapanta de M. Leger, Ĉe Grupo Esperantista, Presejo de Monako*. (Bone presita broŝuro dek-unu-paĝa, kiu traktas pri nova sistemo por subakva skrapado). (3). *Les Libertiaires et la Langue Internationale, Espéranto, de Emile Chapelier*. (47 paĝoj, 10 c). (4). *Esperanto, Exposición de R. G. Brill, Ex-Profesor de Esperanto del Instituto Comercial, Chiclayo, Peru*. (22 paĝoj en la Hispana lingvo).

\* \* \*

Plezure ni rimarkas, ke ĉiam pli granda aro da semajnaj kaj monataj Gazetoj enhavas Esperantan sektion. La lasta, kiun ni ricevis estis la *Bulletin des Sciences Naturelles de Tarare, Rhône, France*. Tie ankaŭ fondiĝos Esperantan Ekzpozicion, kaj oni esperas, ke ĉiuj sendos informojn pri komercaj aferoj. La komerco Tarara estas silk kaj koton-faraĵojn, malpezajn ŝtofojn senornamajn kaj ornamitajn, broditajn kurtenojn, ĉiujn ajn brodaĵojn por virinroboj, velvetojn kaj pluŝojn.

\* \* \*

Kara Sinjoro *Lingvo Internacia por Blinduloj* en punktoj reliefaj, eliros en la lasta semajno de Majo. Provizora Direktoro mi estas. . . . Ni eldonos ses Numerojn en 1904 (posta, se eble, dekdu). La abono kostas por ĉiu lando 3 frankojn.

Kun kora saluto mi estas via, Th. Cart.

Vere la blinduloj havas tre sindoneman amikon kaj ni sendas ĉiujn bondezirojn al la nova kaj potenca ilo, kiu helpas je la disvastigado de Esperanto inter ili. Blinduloj el ĉiuj macioj verkos la artikolojn por tiu ĉi nova Gazeto, kaj ĝi certe estos tre interesa.

\* \* \*

La Redaktoro bedaŭras, ke li ne antaŭe anoncis la fondon de Esperantista Grupo en Battersea. La energia Sekretario estas S<sup>ro</sup> A. T. Lee, 2, *Cupar Road, Battersea, S.W.*, kaj la Grupkunvenejo estas en la "*Board Room, Laichmere Baths, Marde vespere*". Tiu ĉi kurso daŭros dum la tuta somero.

S<sup>ro</sup> Lee saĝe utilis la valoran artikolon de Sir William Ramsay, kiu aperis en la *Daily Mail*, por helpi lian propagandon, kaj presigis ĝin sur aparta folieto, por disdoni, kaj li aukaŭ presigis novan poŝtkarton.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

Edited by H. HOLMESGATE WOOD.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Published by THE LONDON ESPERANTO CLUB, 41, GREAT TEMPLE, LONDON, W.C.

## CONTENTS.

|  | Page    |
|--|---------|
| Enigma's Story .....   | 170-179 |
| The Tenacity, End of Act I (translated<br>by A. Motson) .....                | 181     |
| From the Memorabilia of Minnie<br>Kronstein (translated by K. Embart) .....  | 181     |
| ITEMS OF INTEREST .....  | 182     |
| Advertisement of Clara Fathom (trans-<br>lated by D. H. Lambert, B.A.) ..... | 183     |
| Experiments in Japan .....   | 184     |
| My Dream (William Ober) .....  | 185     |
| THE MEN AT ITS SUMMIT (Thomas<br>Hague, M.A.) .....                          | 186     |
| DEPARTURES FROM (H.M.) .....   | 187     |
| DEPARTURES (H. Holmesgate Wood) .....  | 187-8   |
| THE LAYERS OF PROGRESS (Ben Elroy) .....                                     | 128     |
| THE CURIOUS CASE OF MARY (H. D.<br>Hansard) .....                            | 110-1   |
| ANOTHER HISTORICAL WITNESSES<br>(H.D.) .....                                 | 182     |
| A Man by "HALLMARK" (translated<br>by Paul Doolan) .....                     | 183     |
| CONTEMPORARY POETRY .....  | 184     |

For Local Information apply to the Hon. Secs.  
of the following Official Societies:-

|                                     |                                  |
|-------------------------------------|----------------------------------|
| BATTERSEA—Mrs. A. T. Lee .....      | 2, Coombe Road, Dalrymple.       |
| BRIGHTON—Miss Greenough .....       | 10, Upper Tinsdale Villas, Hove. |
| BURTON—Mrs. F. W. Taylor .....      | 27, Station Road, Burton.        |
| CANTON—Mrs. J. V. Jones .....       | 2, Station Road, Burton.         |
| DOVER—Mrs. H. P. Jones .....        | 1, Station Road, Burton.         |
| DUNDEE—Miss Tweedie, M.A. .....     | 1, Station Road, Burton.         |
| EDINBURGH—Mrs. J. H. Bell .....     | 10, Chambers Road, E.            |
| GLASGOW—Mrs. J. H. Wallace .....    | 1, Hamilton Terrace, Woodlands.  |
| HULL—Mrs. J. H. Taylor .....        | 13, Park Road, Hull.             |
| LONDON—Mrs. W. A. Jeffrey .....     | 42, Park Road, Hull.             |
| MANCHESTER—Mrs. J. H. Jones .....   | 1, Station Road, Burton.         |
| NEWCASTLE—Mrs. H. A. Jones .....    | 1, Station Road, Burton.         |
| NOTTINGHAM—Mrs. A. H. Jones .....   | 1, Station Road, Burton.         |
| PORTSMOUTH—Mrs. J. H. Jones .....   | 1, Station Road, Burton.         |
| PLYMOUTH—Mrs. J. H. Jones .....     | 1, Station Road, Burton.         |
| READING—Mrs. J. H. Jones .....      | 1, Station Road, Burton.         |
| ST. ANDREW'S—Mrs. J. H. Jones ..... | 1, Station Road, Burton.         |
| WIMBORNE—Mrs. A. H. Jones .....     | 1, Station Road, Burton.         |

The Editor is not responsible for the opinions expressed in the articles, or for the accuracy of the information given in the notices.

## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

*Unbound by ties of nationality:  
The common bond of union of all civilised peoples.*

The Remington can be supplied fitted for  
Esperanto.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

## La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMAŜINO.

*Pripensu je tio!*

LA INTERNACIA MAŜINO.

*Tute liberigita de naciaj ligiloj:  
La Komuna unuigilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.*

La Remington estas liverita kun Esperantaj  
prestibarej.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

JUST PUBLISHED.

## Text Book of Esperanto.

First Edition of

**100,000.**

... THE INTERNATIONAL LANGUAGE.

Price 1½d., post free. For Propaganda purposes, 10d. per dozen, carriage extra.

PUBLISHED BY DIXON & HUNTING, FARRINGTON PRESS, LTD., 190, FLEET STREET, LONDON, E.C.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi.

- DRO. G. BUSUTTIL, Misida, Malta. Pri diversaj temoj. Deziras partopreni "Rondiranton" de Samideanoj.
- M. DELACHE, 82 rue Broquerecque, Boulogne sur Mer, France. Pri maraj konstruaĵoj kaj interŝanĝos dokumentojn kaj disegnaĵojn pri tiu temo.]
- M. A. GEHET, 10 rue de l'Ouest, Rouen, France. Deziras klopodi pri teknika vortaro pri la metal—ka maŝin—komerc.]
- C STUART-MENTRATH, Esq., 23, Upper Bedford Place, London, W.C. Precipe kun alilandanoj prefero pri Gardenaj Urboj kaj scienco de heredo por malhelpi homan degeneron. Interŝanĝos THE ESPERANTIST kontraŭ alilandaj Esperantaj Gazetoj.]
- A. T. SIMPER, Esq., Ataree Khat T.E., Singribari Hat, P.O. Mangaldai, Assam, N. India. Interŝanĝos fotografajojn kun alilandanoj.]
- H. W. SOUTHCOMB, Esq., The Park, Yeovil, England. Pri ĉiuj aferoj kun alilanduloj. Deziras rekonkti Esperantistojn de Ilfracombe (N. Devon) dum Julio.]
- Miss M. WHITE, 60, Dalziel Drive, Pollokshields, Glasgow, Scotland. Esp. Vidaĵkartojn el ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.]

La Kosto de la Enskribo estas 6d. (70c. per poŝtsignoj).

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

The Hon. Sec., ESPERANTO CLUB, 41, Outer Temple, London, W.C.  
AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
FRANCE.—M. C. Gaubert, 9, rue Charras, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol. Podjaceskaja 24 log 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtsignon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povus sendi la abonpagon per poŝtsignoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

No. 9.

JULIO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

La Angla Unufolio, enhavanta tutan Gramatikon kaj sufiĉe grandan vortaron, estas tre valora propagandilo. Nur per Esperanto estas eble skribi leteron al iu, kiu ne komprenas la lingvon, kaj per tiu unufolio (kies kosto estas nur dek centimoj) la letero estas tute komprenebla. Por ke tio ĉi estu kiel eble plej utila por la Esperantistaro, estas necesege ke ĝi ekzistu en diversaj lingvoj. Se niaj alilandaj Samideanoj presigos tradukojn en siajn proprajn linvojn, ni plezure aĉetos centojn da ekzempleroj; sed se ili devigos nin presigi tradukojn en la Franca, Germana, k.t.p., lingvoj ni esperas, ke ili siaparte aĉetos milojn da ili de ni. Sed, nature, ĝi devas fariĝi parto de la alilanda propagando. Ni fidu, ke baldaŭ tiuj unufolioj multe helpos nian aferon, precipe inter la komercistoj en ĉiuj landoj.\*

Alia sistemo por gajni aligantojn estas la instruado de Esperanto inter la sciamaj junularo. Ĉu niaj Esperantistaj gepatroj petos al la instruistoj ke ili instruu iliajn gefilojn pri la internacia lingvo? Kaj ĉu la Esperantistaj instruistoj instruos Esperanton en siaj lernejoj? Ni ĝin esperas, kaj jam ricevis kelkajn interesegajn leterojn de estroj kiuj jam faris tiun ĉi, kun bonegaj rezultatoj. Ĉiam kaj ĉie la geknaboj treege ŝatas nian logikan lingvon. La klopodo inter la junularo memorigas al mi, ke Sro. Privat, Direktoro de *La Juna Esperantisto* (9, *Av. des Vollandes, Geneva*), sciigis min, ke li nur havas du abonantojn en Anglujo. *La Juna Esperantisto* celas disvastigi Esperanton inter la junuloj, kaj ni plezure akceptos jarabonpagojn (2 frankoj) por tiu ĉi dumonata ĵurnalo.

\* *We have just received a Bulgarian Broadsheet, price 1d. May the others soon follow.*

The English Broadsheet, containing a complete grammar and an adequately large vocabulary, is a very valuable means for propaganda. In Esperanto alone is it possible to write a letter to anyone who does not understand the language, and with that broadsheet (the cost of which is but a penny) the letter is entirely comprehensible. In order that this may be as useful to Esperantists as possible, it is essential that it exist in divers languages. If our foreign friends will have translations printed in their own languages, we will gladly purchase hundreds of copies; but if they compel us to print French, German, etc., translations, we hope that they for their part will buy thousands of them from us. Obviously, it should become part of the foreign propaganda. Let us trust that soon those broadsheets will greatly help our cause, especially among business men in all countries.

Another means of gaining new adherents is the instruction of Esperanto to studious young people. Will our Esperantist parents ask teachers to instruct their children in the international language? And will Esperantist masters teach Esperanto in their schools? We hope so, and have already received some most interesting letters from principals who have already done so, with excellent results. In every instance children greatly appreciate our logical tongue. The movement among the young folk reminds me that M. Privat, Editor of *La Juna Esperantisto* (9, *Avenue des Vollandes, Geneva*), tells me he has only two subscribers in England. *La Juna Esperantisto* aims at spreading Esperanto among the young, and we will accept with pleasure annual subscriptions (1s. 9d.) for this bi-monthly journal.

Sinjoro Cart ankaŭ plendas, ke la Brita Blindularo ne ankoraŭ kolektigis sub la nia Standardo. La nova *Esperanta Ligilo* (monata) en la Braillea skribo eble tuj plibonigos tiun malbonan aferon. Ĉiuj blinduloj devas sin turni al *Profesoro Cart*, 12, *Rue Soufflot*, Paris.

La verkintoj de *A New Hobby* afable donacis al the London Esperanto Club por senpaga disdono, la restaĵon de la eldono. Tiuj Esperantistoj kiuj sendos la poŝtelspezon povos havi senpagan aron de tiu interesa broŝuro.

"*Ies perdo, alies gajno!*" estas ja prava proverbo. Kvankam ni Angloj multe bedaŭras la foriron de du el niaj plej fervoraj kunlaborantoj, ni konsolas nin je la penso ke Germanujo kaj Queenslando nun havos novajn kaj lertajn adeptojn, kiuj povos estri novajn grupojn tie. Ne do estas perdo, sed nur translokigo de energio! Bondezirojn kaj Sukceson!

La someraj libertempoj alvenas, kaj ĉiuj bonaj Esperantistoj kompreneble deziras vojaĝi alilande, por paroli Esperante. Estos do interese rimarki, ke mi ricevis tre afablajn leterojn de Kapitano Capé, en Alĝerujo, kaj Sro. David, de la Grupo en St. Claude, Jura, promesantaj tre koran akcepton de Anglaj Esperantistoj. Mi denove diru, ke la Departemento Jura estas tre vizitinda loko, kaj mi konsilu ĉiujn, kiuj povas, ĝui la belajn montojn, aeron kaj lingvon. Mi bedaŭras, ke spaco mankis por la du afablajn leterojn. Eble Alĝerujo estos pli komforta dum la vintro.

Ĉar la unua tago de Aŭgusto estas Angla *bank-libertago*, kaj tiom da niaj Abonintoj estos en Havro, mi provos sendigi la dekan numeron de THE ESPERANTIST je Julio 28. Tiu numero enhavos tre interesan Danan rakonton de nia bonekonata kunverkantino, Fraŭlino Baŭer. Ankaŭ originala artikolo el Hindujo, de Sro. Simper verkita, kaj ankoraŭ alia harstariganta originala rakonto, de la sindonema O.W., tie troviĝos.

Vere THE ESPERANTIST baldaŭ fariĝos tute fama pro la terurigaj rakontoj kiujn ĝi enhavas! Tiuj ĉi kun la kutimita poezio espereble donos niajn Legantojn sufiĉe da interesaj temoj por la libertempo.

Amiko, kiu pensas pri mia laboro pli ol sia propra plezuro, proponis ke mi sekvu la planon de alilanda Gazeto, kaj ne eldonu Aŭgustan numeron. Sed, laŭ mia opinio, tio ĉi estus nedezirinda. Ĉiunonate mi sendos kiel eble plej legindan gazeton al la Abonintoj, fidante ke ĝi daŭrigos ilian intereson.

M. Cart also complains that the British Blind have not yet rallied round our Standard. The new *Esperanta Ligilo* (monthly) in Braille will possibly at once remedy this misfortune. All blind students should apply to *Professor Cart*, 12, *Rue Soufflot*, Paris.

The authors of *A New Hobby* have kindly presented the London Esperanto Club with the remainder of the edition for free distribution. Those Esperantists who will send cost of postage can have a number of that interesting brochure free.

"Someone's loss is another's gain" is indeed a true proverb. Although we English greatly regret the departure of two of our most earnest fellow-workers, we console ourselves in the thought that Germany and Queensland will now possess new and able adepts, who will be able to preside over new groups there. It is therefore no loss, but merely a translocation of energy! All good wishes and success!

The summer holidays approach, and all good Esperantists naturally want to journey abroad to speak Esperanto. It will, then, be interesting to note that I have received very kind letters from Captain Capé, in Algeria, and M. David, of the Group in St. Claude, Jura, promising a very hearty welcome to English Esperantists. Let me state once more that the Departement Jura is a place to be visited, and let me advise all who can to enjoy the lovely mountains, air, and language. I regret that space is lacking for the two kind letters. Perhaps Algeria will be more comfortable in winter time.

As August 1st is an English Bank-holiday, and so many of our Subscribers will be in Havre, I will try to have the tenth number of THE ESPERANTIST sent out on July 28th. That issue will contain a most interesting Danish tale, by our well-known collaborator, Miss Bauer. Also an original article from India, written by Mr. Simper; and a further hair-on-end original story, by the devoted O.W., will appear there.

THE ESPERANTIST will in truth soon become quite famous on account of the terrifying tales therein contained! These, with the usual poetry, will, it is hoped, give our readers enough interesting matter for the holidays.

A friend who thinks more of my work than his own pleasure, proposed that I should follow the example of a foreign Gazette, and not issue an August number. But, in my opinion, this would be undesirable. Every month I will send Subscribers a gazette as readable as possible, trusting that it will sustain their interest.

[Copyright reserved.]

## LA VENTEGO (Daŭrigo).

[Tradukis Esp. 0306.]

(Vidu la ok antaŭajn N-rojn.)

AKTO I. (fino).

SCENO 2 (fino).

PROSPERO.—Silentu! se vi diros unu vorton  
 Mi vin kulpigos, eble vin malamos!  
 Ĉu vi trompanton tian ŝirmi volus?  
 Vi pensas ke ne pli belformo estas,  
 Ĉar vi nur vidis lin, krom Kalibanon.  
 Anĝeloj vere la ceteraj homoj,  
 Ĉi tiu nur alia Kalibano!

MIRANDO.—Amemo mia do, humila vere,  
 Pli belan homon ne deziras vidi!

PROSPERO (al Ferdinando).—Obeu; venu; la ner-  
 varo via  
 Sen fortikeco, nun reinfanigas.

FERDINANDO.—Tro vere estas: nun min mem mi  
 sentas  
 Malliberulo. La kruela perdo  
 De patro kaj amikoj, la minacoj  
 De homo, kiu tiel min ofendis,  
 Nu, ĉio al mi ŝajnus suferebbla,

Se, foje, tage, mi ekvidi povus  
 Ĉi tiun junulinon. Libereco  
 Aliajn terajn lokojn povas ĝui:  
 Sufiĉa spaco por mi estus tiu  
 En kiu ŝi aperos.

PROSPERO (flanken).—Tio taŭgos:  
 Vi bone ellaboris, Arielo.  
 (Al Ferdinando) Nun, venu! (Al Arielo) Aŭdu  
 plie por la sekvo.  
 (Al Ferdinando) Tuj venu kun mi!

MIRANDO.—Kuragiĝu, tamen,  
 Ĉar bonnatura estas mia patro  
 Pli ol paroloj liaj; li malofte  
 Kolere agas.

PROSPERO (al Arielo).—Ho, vi liberigos  
 Simile al montventoj—sed, memoru  
 Fidele la ordonojn.

ARIELO.—Akurate!

PROSPERO (al Ferdinando).—Min sekvu! (Al  
 Mirando) Kaj vi, por li ne potegu.  
 (Foriras ĉiuj).

## PENSOJ EL LA MEDITADOJ DE MARKO AŬRELIO.

Tradukitaj de Kasimir Eucharis.

Kiom da noblaj kaj famaj homoj estas mala-  
 perintaj el historio, kaj hodiaŭ estas forgesataj  
 ĉe ni.

\* \* \*

Mi faros tion, kio estas mia devo, tio sufiĉos.  
 Sed pri aliaj aferoj mi neniam eniĝos pri ili.  
 Ĉar ili estas aŭ sen la vivo, aŭ sen la rezono, aŭ  
 eble ili estas perdintaj sian vojon kaj ĝin ne povas  
 trovi.

\* \* \*

Aleksandro la Granda kaj lia ĉevalisto, kiam  
 mortitaj, estis ambaŭ en la sama kondiĉio, kaj  
 ambaŭ havis la saman hazardon esti disĵetitaj en  
 atomoj, aŭ esti sorbitaj en la animo de la universo.

\* \* \*

La plej granda afero por ĉiu homo estas pli-  
 bonigi sian spiriton, do, rigardu bone, kiamaniere  
 li tion faras. Sed pri ĉiuj aliaj aferoj, eblaj aŭ  
 neeblaj, ili estas nur cindroj kaj fumo.

\* \* \*

Kiam vi estas farinta ian bonecon, kaj kiam via  
 najbaro estas plibonigata pro tio, ne estu tiel  
 malsaga kiel serĉi pluan laŭdon aŭ famon pro tio,  
 kion vi faris.

\* \* \*

Ne agu tiel, kiel se vi havis dek mil jarojn por  
 disĵeti. Memoru, la anĝelo de la morto staras

ĉiam apud vi. Estu do bona pro io, kaj agu bone  
 dum ke vi vivas kaj ĝi estas ebla tiel fari, ĉar  
 kiam morto venos demandi vian korpon, de tiam  
 vi povos fari nenion.

\* \* \*

Revenu al la principoj de la saĝeco kaj vereco,  
 kaj tiam tiuj ĉi, kiuj nune vin rigardas kiel simio  
 aŭ kiel sovaĝa besto deigos vin post unu semajno.

\* \* \*

Tio, kio estas agrabla al vi, Ho Naturo! estos  
 agrabla al mi. Nenio estos tro frua aŭ tro  
 malfrua por mi, kiu estas sezona al vi, Ho bela  
 Patrino! Ĉio, kion la sezonoj alportos al mi estos  
 bona kaj bela. El vi venas ĉio laŭ ĝia propra  
 sezono, kaj laŭ propra sezono ĝi revenos al vi.  
 Kaj tie, kie la poeto kantis: "Kara Urbo de  
 Cekropo," ĉu mi ne kantas: "Kara Urbo de Dio."

\* \* \*

Kiam vi estas kolerega kaj ĉagrenega, tiam  
 memoru, ke la homa vivado daŭros dum momento  
 kaj poste, ĉiu el ni, tre rapidege, enteriĝos en la  
 tombo.

\* \* \*

Kaj hieraŭ Antistinio diris al mi en la Senato:  
 "Ho Aŭrelio, estas reĝa kaj nobla afero esti  
 mallaŭdata kiam vi faras bonajn farojn!"

## DIVERSAJ AVIZOJ.

La Redaktoro multe bedaŭras, ke tiom da abonintoj plendis pri la prokrasto de la sendo de siaj Gazetoj. Se oni sendis la abonpagon rekte al li, THE ESPERANTIST ĉiam estas sendita per revenanta poŝto. Sed, se la abonpago estas sendita al alilanda ricevanto, la sendo ne povas esti tiel rapida. Kaj la Redaktoro ne povas garantii tujan sendon de alilandaj Gazetoj, menditaj per li. Li nur scias, ke la nomoj de la abonintoj ĉiam estas tuj senditaj al la Redaktoro de la mendita Gazeto, kaj ne plu estas lia afero.

*Cunctari funestissimum* ŝajne ne estas alilanda Esperanta proverbo. Ĝi estu la Angla devizo!

Ĉiuj Esperantistoj multe ĝojos lerni ke Sro. de Mênil finigis sian grandan laboron, kaj ke la *Tutmonda Jarlibro* eldoniĝis. La unua parto estas la nova *Adresaro*, kaj poste troviĝas milojn da adresoj el ĉiuj landoj. Ja utiliga verko, pri kiu la sindonema aranĝinto devis esti multe zorginta. Ĉiuj Esperantistoj devas havi tiun ĉi libron, kiu enhavas multe da interesaj avizoj, krom la granda nomaro. (Price 2s., post free, from the Librarian).

Ni ankaŭ ricevis *Esperanto in dieci Lezioni*, Itala traduko de *Esperanto en diez Lecons* (kosto 8d., verkita de Conte Albert Gallois, en Riolunato). Ĝi helpu la Italian movadon.

Ankoraŭ alia lernolibro por niaj Francaj amikoj! Tiun ĉi fojon, estas: *Cours Commercial d'Esperanto* (1s. 6d. post free) verkita de Léon Marissaux, 139 paĝoj; estas nur unu vorto por priskribi tiun ĉi verkon: *Bonega*. Tie oni, de la komenco ĝis la fino, nur legas frazojn utilaj por ĉiutaga vivado, kaj ne la fantaziajn frazojn, kiuj kutime troviĝas en ĉiaj lernolibroj. Kaj la pecetoj por traduki estas mallongaj kaj utilaj skizoj pri ĝeneralaj aferoj, tiel kiel Bicikloj, Loĝejoj, Leteroj, k.t.p. Ni esperu ke ni Angloj baldaŭ posedos tian utilan komercan lernolibron.

"*La fundo de l'Mizero*," tradukaĵo de Pola rakonto farita de la bonekonata Esperantisto "Kabe." Kosto 8d., 91 paĝoj. Nia Pola Samideano donis al ni tre lertan tradukon, sed ni korege konsilas almenaŭ niajn legantinojn, ke ili ne legu tiun ĉi verkon. Priskribo pri la vivado de lepruloj, rakontita en maniero kiel eble plej terura, ne tute estas legindaĵo por ili, kaj, ni estas preskaŭ certaj ke, se iaj el niaj legantoj

komencos la tralegon de tiu ĉi verko, ili senhalte legados ĝis la fino, kaj pensos kune kun ni, ke estus estinta pli bone, se la unua paĝo estis estinta la lasta, kaj ke la restaĵo skribiĝis neniam. Ne ĝin legu, do, ĉar ĝi alportos nenian bonon.

"*Por niaj filoj kiam ili estos dek-ok jaraj*" de Dro Paul Rodet enhavas 32 paĝojn, kaj traktas tre lerte pri malfacila kaj delikata temo. Ni konsilas ke la junuloj, por kiuj la libro estis skribita, ĝin legu.

Eble, kiam oni vidos tiujn ĉi vortojn, oni jam estos vidinta sur ĉiuj Anglaj stacidomaj libretoj malgrandan rugan Esperantan lernolibron, kies kosto estas unu penco. La unua eldono estas cent mil ekzempleroj, kaj espereble multe helpos je la rapida disvastigo de la lingvo inter ĉiuj Anglaj-parolantaj popoloj.

Ni deziras danki la multe da amikoj kiuj sendis prestrancaĵojn. Tiuj ĉi ĉiam plioftiĝas, kaj nepre pruvas la progreson de nia kara afero.

Sukcesa parolado estis farita en la Urbestrejo de Dovero, kaj nova sed forta grupo tie fondiĝis, dank' al la klopodoj de kelkaj fervoraj tieaj kunbatalantoj. La Hon. Sek. de la Grupo estas Sro. H. R. Geddes, *Northumberland House, Dover*, kaj ni esperas, ke tiuj legantoj, kiuj vizitos Doveron dum la somero, povos helpi lian propagadon. La nova Grupo eldonas belajn poŝtkartojn, ilustrantaj la uzo de la Esperantaj partecoj per la verbo Trinki! Kosto 8 pencoj la dekduo, 1s. la centoj, de 41, Outer Temple, W.C.

Nova Grupo ankaŭ fondiĝis en Brighton, laŭ la anonco en No. 8. *Fraŭlino C. Ozenford*, 16, *Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex*, estas la tiea Hon. Sek., kaj tre plezure ricevos la nomojn de novaj Membroj, kaj proponoj pri la Grupaj aferoj.

Amikoj en Ilfordo, Essex, ankaŭ sukcesis krei novan grupon apud Londono. La Hon. Sek. estas Sro. W. A. Jeffery, 42, Park Road, Ilford, E.

La *Unua Akto* de *La Ventego* finiĝas en tiu ĉi numero. Laŭ la anonco en No. 8, la tuta Dramo eldoniĝos en aparta libro (kosto 1 fr. 50) tuj kiam sufiĉe da mendoj estos ricevataj. Anstataŭ la Ventega paĝo, estontaj numeroj enhavos paĝon en



la Angla lingvo titolata "Our Progress" kiu enhavos avizojn pri la novaj pruvoj de nia progreso.

\* \* \*

La Maltaj Esperantistoj enkondukis tre sukcesan novaĵon. Anstataŭ ol kunveni en ĉambro, ili fotografiĝis, faris tre plezurajn ekskursion en la kamparon, kaj aŭskultis Esperantan rakonton, kaj preparolis Esperante tre plezure. Certe, dum la varma vetero, tiu ĉi plano estas kiel eble plej multe sekvinda.

\* \* \*

Kara Sinjoro Redaktoro, Doni Esperantajn

nomojn al Esperantaj aferoj estas sendube tre bona regulo. Sed oni ne havas ian rajton ŝanĝi la titolon de la plej granda verko de la granda Doktoro. *Krestomatia* estas ordinara vorto en la Franca kaj Greka lingvoj por *Ekzemplero klasika de la literaturo de ia lingvo*. Estus tute facile aldoni al via anonco de tiu ĉi fama libro kelkajn priskribantajn vortojn, sed la titolo devas resti, ĉar ĝi estas nun parto de la *historio de la lingvo*. Via fidele, R. J. Lloyd (D.Litt., M.A.).

(N.B.—Pravege! sed ne estas dubo ia, ke la titolo de la verko multe malhelpas je ĝia disvastiĝo tie ĉi.—RED.)

### TERURIGA AVENTURO DE FERDINANDO, GRAFO FATHOM.

De Dro. Smollet, tradukita de D. H. Lambert, B.A. (Oxon.), 9660. (Finigita; Vidu paĝo 118 por la komenco).

Malkovrinte gardistlanternon, ili trafis ĉe la kvazaŭ dormanto, kaj la tenanto enpuŝis ponardon en lian koron. La perforto de la trudo kunpremis la bruston, kaj speco de ĝemo eliris el la traĥeo de la mortinto. Oni refaris la frapon sen ia simila sono, pri kio la mortigantoj kredis, ke sia tasko estis finita, kaj eliris el la ĉambro, decidinte reveni por rabi la korpon je sia libera tempo.

Nia heroo neniam pasigis iometon da tempo tiel agonie, kiel en la nuna okazo; la tuta supraĵo de lia korpo kovriĝis de malvarma ŝvito, kaj liaj nervoj skuĝiĝis de grandega tremado. Por mal-longe skribi, li estadis sub sveno, kiu verŝajne helpis lian konservon: ĉar, se li estus reteninta la uzadon de siaj sentoj, eble la elsaltoj de lia teruro estus fariĝintaj lia malkovrilo. La unua uzo, kiun li faris de lia rekonsciigo estis rimarki ke, retirante, la mortigistoj lasis la pordon malfermita; kaj li tuj estis utiligonta tiun ĉi ilian senzorgon, sin eljetante sur ilin kun danĝero de sia vivo, kiam lin haltigis interparolado, kiun li ekaŭdis el la malsupra ĉambro, konstatante la intencon de la rabistoj denove forveturi, esperante kapti pli da rabaĵo. Ili tiel foriris, forte ordonante al la maljunulino, ke ŝi ŝlosu la pordegon dum ilia forestado. Ferdinando rapide efektivigis sian pripenson. Tuj kiam, laŭ lia diveno ili sufiĉe malproksimiĝis de la dometo, levigante el sia kasejo, li kviete sin movas al la lito kaj, elserĉinte la poŝojn de la mortinto trovis monujon, plenigita de dukatoj, kiujn, kune kun argenta poŝhorloĝo kaj diamanta ringo, li proprigis al si sen bedaŭro. Tiam, malsuprenirinte zorge kaj singardeme en la ĉambron, li sin prezentis antaŭ la maljuna pekulino antaŭ ol ŝi havis la malplejan ideon pri lia alveno. Kvankam kutimita al la sanga komerco,

ŝi ne vidis tiun ĉi aperaĵon sen signoj de teruro kaj mirego, kredante, ke ĝi estis la fantomo de ŝia lasta mortigita gasto.

Mallevigante sur genuojn, ŝi ekkonfidiĝis al la protekto de la Sanktuloj, sin kruciĝante je tiom da fervoro kvazaŭ ŝi estis titolata al la speciala ĉiela atento. Nek ŝia zorgeco malgrandiĝis kiam ŝi kleriĝis pri tiu ĉi diveno, kaj eksciis, ke ĝi ne estis fantomo, sed vera homa formo kiu, ne atendante por ŝin riproĉi pri la vasteco de ŝiaj krimoj, ordonis per minacoj de la morto, ke ŝi alkondukigu al li la ĉevalon. Ŝi devis obei tian ordonon, kaj li ŝin tuj sidigis sur la selo, kaj suprenirante mem poste, transdonis al ŝi la kondukilojn, ĵurante per tonoj plej severaj, ke la nura ilo por konservi ŝian vivon troviĝis en lia senriska alveno ĉe la proksima urbo, kaj ke tuj kiam ŝi kaŭzus al li kian ajn dubeton pri ŝia fideleco li senkompatate fariĝus ŝia mortigisto. Tiu ĉi deklaro faris la deziritan efekton sur la maljuna inferulino kiu, treege petegante al li kompaton kaj pardonon, promesis lin gvidi sendanĝere en vilaĝon, malproksima de kelkaj kilometroj, kie oni loĝigus lin, kaj venigus al li nelacigitan ĉevalon aŭ kion ajn plie li bezonus por daŭrigi sian vojaĝon. Per tiuj ĉi kondiĉoj, li diris, ŝi povus meriti lian bonanimon. Ili tiel kunrajdis, ŝi sidante forke sur la selo, tenante la bridon per unu mano, kaj vipeton per la alia, dum nia aveturanto sidis poste, observante ŝian konduton, kaj altenante apud ŝia orelo la buŝon de pistolo. Tiamaniere aranĝitaj, ili transiris parton da la sama arbaro, kie lia kondukisto lin forlasis la antaŭan tagon. Estas kredeble, ke li ne pasigis la horojn en plej agrabla revado, sin trovante envolvata en la labirinto de tiuj ombroj, kiuj ŝajnis al li esti la oftejo de rabado kaj mortigo.

Ordinara timo estis komforta sento nekomparinda kun tia, kian li nun posedis. La unuaj paŝoj, kiujn li alprenis por sinkonservo estis la efektoj de nura instinkto, dum lia kapablecoj estingiĝis aŭ subpremiĝis de malespero. Sed, nunatempе, kun la reveno de pripensado, plej teruraj antaŭsentoj lin atakis. Ĉiu brueto de la vento tra la arbaretoj ŝveladis ĝis la raŭkaj minacoj de mortigo! La skuado de la branĉoj prezentadis al li la vibradon de ponardoj, kaj ĉiu ombro de arbo fariĝis la apero de sangema fripono!

Mallonge, en tiuj ĉi okazoj li elsentis tion, kio lin turmentis milfoje pli ol la piko de vera rapiro, kaj kun ĉiu nova spasmе de timego, li rememorigis al sia kondukantino per ankata torento de ĵuraĵoj, ŝin avertante, ke ŝia vivo neeviteble dependis de lia opinio pri lia propra konservo. La homa naturo ne povis longe ekzisti meze de tiel komplektitaj timoj. Fine li sin trovis for de la arbaro kaj benita de malproksima vidaĝo de loĝejo. Li tiam ekturnis siajn pensojn je nova afero. Li pripensadis ĉu li paradus sian brevegecon kaj sindonemecon, konfesante sian ruzon, kaj transdonus sian gvidantino al la legpuno, aŭ ĉu ne estus pli saĝe, ke li forlasus la maljunan Hekaton kaj ŝiajn kunsiantojn al konsciencaj pikoj, kaj ke li kviete daŭrus sian vojaĝon Parizon, je sendisputata posedo de la kaptaĵo, kiun li jam

akiris. Tiun ĉi paŝon li do decidis fari, rememorigante, ke per siaj sciigoj la rakonto de la mortigito nepre elvokus la atenton de la justeco, en kiu okazo la havo kiun li *prunteprenis* de la mortiuto devus esti redonata en favoro de liaj heredantoj. Jen argumento, kiun nia aventuranto ne povis kontraŭstari. Li autatŭvidis la verŝajnecon, ke oni de li malproprigus lian akiron—kiun li rigardis kiel premio de la kuraĝo kaj saĝeco—kaj lin detenus kiel atestanto je la rabistoj, kun evidenta domaĝo al liaj propraj aferoj. Eble li ankaŭ elsentis konsciencajn kaŭzojn, kiuj lin malkonsilis atesti kontraŭ kanajlaro, kies emoj preskaŭ ne povus diferencigi de la siaj!

Tiel pripensinte, li cedis al la unua petegado de la maljunulino, kiun li eksigis ĉe loko apud la vilaĝo, elpetinte, ke ŝi forlasu vivadon tiel malhonestan kaj siajn krimegojn, transdonante siajn kunkulpulojn en la manojn de la justeco.

Ŝi ne mankis promesi tutan reformigon kaj, dejetinte sin antaŭ li pro lia bonegeco, ŝi foriris al sia dometo, forte decidinte konsili siajn kunmortigantojn, ke ili rapidege rajdu al la vilaĝo por kulpigi nian heroon.

Sed tiu ĉi, saĝege, nekonfidante je ŝiaj protestoj, nur haltis por lui kondukanton ĝis la proksima haltejo, kiam li sin trovis en la urbo Chalons sur Marne.

## ESPERANTO EN ĴAPONUJO.

Letero de Sro. van Doorn en Yokohama.

26 Aprilo, 1904.

TRE ESTIMATA SAMIDEANO,—

Mi nun plezure sciigas vin iom pri la kondiĉo de Esperanto en tiu ĉi lando. Unue mi devas diri, ke la progresado de nia lingvo, ĵus estis komencita, kiam ĝi ricevis seriozan haltigon de la nuna militado, kiu okupas ĉiujn la atentojn de la ĉi-tiuloj.

La propagandado estas tre malfacila tie ĉi, ĉar la Angla lingvo estas deviga temo en ĉiuj lernejoj sub la registara observo. Foje estis proponite plibonigi la ortografion de la Angla lingvo kaj fari specon da Mond-Angla, por la speciala uzo de tiu ĉi lando, ĉar, kvankam utiliga, la Angla estas tre malfacile ellernebla por la Ĵaponoj pri tio, ke la ortografio estas tiel absurda. Sed la propono rezultis en nenio. Tamen estis eldonita en Tokio ĵurnalo *The Voice* kiu formetis ĉiujn silentajn literojn kaj aliajn konfuzajn mallogikajn uzadojn. Plie, tiu ĉi estas granda kosmopolita urbo, kaj la propono alpreni helpan lingvon estis tre favore ricevita. Tial la helpa-lingvo Volapük havis tie ĉi multe da studentoj. Hodiaŭ ĝia malprospero

kreis multe da skeptikuloj kaj Esperanto estas atakita de la loka Gazetaro. Nun, kvankam la Angla lingvo estas iom konata de ĉiuj Ĵapananoj, estas vulgare por Ĵaponoj kaj Ĥinoj ĝin paroli, sed la parolado de la Franca kaj Germana lingvoj estas distinga! Ĵaponoj, dum kvardek jaroj, estas alprenintaj okcidentan civilizacion, kaj nun povas administri ĉiujn siajn departementojn sen helpo de alilandaj instruistoj, krom malmultaj ŝipestroj de poŝtŝipoj, kaj malmultaj profesoroj en diversaj Ĵapanaj lernejoj. Je tiuj ĉi ni devas esperi, ĉar ili havas gravan influon inter la bone edukitaj Ĵaponoj. En diversaj partoj de Ĵaponujo jam de kelka tempo ekzistas izolitaj instruistoj kaj aliaj, kiuj estas konvinkitaj pri la bonegeco de Esperanto, kaj pri ĝia plena taŭgeco kiel internacia helpa lingvo. Jam iliaj influoj estas videblaj, ĉar la Ĵaponoj komencis ellerni Esperanton. Sed, bedaŭrinde, tiuj ĉi diversnaciaj pioniroj ĝis nun restis tute izolitaj, laborante ĉiuj aparte. Kredeble nia afero multe pli rapide antaŭenirus, se ĉiuj Esperantistoj tie ĉi konsentus kunigi siajn fortojn kaj fondiĝus ĝenerala kaj centra grupo.

## KANTETO.

Karulino Mia.

Originale verkita. De William Officer. Tradukita en la Sokta lingvo.

Kiam la maten' lumigas,  
Ho karulino mia!  
Ĝia belec' memorigas  
Plej dolĉe min de via.

Kiel ĉirkaŭ mi varmeco  
De la tagmeza horo  
Falas, ĝi min pripensigas  
Pri via korfervoro.

La vespero, rosa, stela,  
Kun sia trankvileco,  
Murmuretas la rakonto  
De via amemeco.

Tiel je animo mia  
Eterne vi ĉeestas;  
Kaj per songo-lumo  
Imago vin envestas.

La belega mondo perdus  
Por mi brilecon sian  
Se am' via malvarmigus  
Ho, karulino mia!

My Dearie.

When lichts the mornin'  
O dearie o' mine!  
Its beauty remin's me  
Maist sweetly o' thine.

As at noontide the sinbeams  
On earth saftly rest,  
I think o' the fervour  
That glows i' thy breast.

The e'en, wi' its stillness,  
Its starnies, an' dew,  
The tale o' thy kin'ness  
Aye whispers anew.

Sae thou tae my soul  
Art near evermair;  
And fond fancy cleeds thee  
In dream glamours fair.

For me the braw warl'  
Its brichtness wad tyne,  
Should thy love e'er grow caul'  
O dearie o' mine!

## ZENITA SUNO.

Originale verkita de Thomas Hunter, M.A.

Ho! Suno en plej alta vojo,  
Ci venas kun somera ĝojo;  
Tagiĝas nun la tago glora  
Junio dudekunu flora.

Pli frua estas kant' miela  
De la arbara birdo bela  
Kies fluida voĉo penas  
Dum ci en roza robo venas.

Ĝojas la besto, ĉia floro  
Kun la plej riĉa bonodoro,  
Kaj kun la plej kolora helo  
Disdonas benon de l'ĉielo.

Homaro nun per interamo  
Respondus al la cia flamo,  
Ĉar venas ci en alta vojo,  
Ho! Suno kun somera ĝojo.

## NEATENDITA AVIZO.

Oni ofte diras: "Jes, Esperanto estas tre bona ideo, sed ĝi ne utilos al mi!"

La Redaktoro posedis amikon, kiu tiel pensis. Li havis neniam rilatojn kun alilanduloj, kaj ŝajne estis kontenta je la kono de la Angla lingvo.

Subite, li eltrovis, ke li apartenas al fama antikva Franca familio, kies kastelo troviĝis en la Francaj Alpoj. Bone, bonege, li pensis. La Angla lingvo sufiĉas ĉie! Li do forveturis, por viziti la familian naskiĝejon.

Alveninte en tiun malproksiman regionon, li eliras el la vagonaro, kaj eniras la hotelon. Ho, ve! El la tuta vilaĝanaro neniu komprenas lian lingvon. Preskaŭ ĉiuj Eŭropaj lingvoj tie havis siajn anojn, krom la Angla. Mia amiko estis tre malĝoja. Komprenable, mi ofte preparolis Esperanton kune kun li, kaj li multe miris, kiam, je vespermanĝo, li aŭdis la nomon de nia kara lingvo! Morgaŭe, tute sole kaj silente, li vizitis la antikvan kastelejon de siaj praavoj.

Ĉion, kion la okuloj povis rimarki, li bone eltrovis, sed plu li ne povis lerni.

Post lia reveno en Londono, li rakontis al mi tiun ĉi bedaŭrindan okazon. "Ho!" mi ekkriis, "estos facila afero klarigi ĉiujn malklaraĵojn! Se plaĉos al vi, vi povos profiti de mia kono Esperanta." Iom dube, mia amiko diris al mi tion, kion li deziris, ke mi demandu; kaj mi tuj skribis al la sindonema Sro. Sentia, kies poemetojn estas tiel bonekonataj.

Mia malnova amiko multe miris, kiam, post nur kvar tagoj, mi metis inter liaj manoj, longan leteron, enhavanta tre interesan historion de la kastelo, kaj ĝiaj loĝantoj, kaj multe da pluaj sciigoj, kiujn li neniam antaŭe lernis. Dank' al Esperanto, li nun scias ke, dum la antaŭaj militadoj, la Duko de Savojo indulgis tiun Kastelon, kiam liaj soldatoj ruinigis ĝiajn najbarojn, ĉar la tiama posedanto iam estis donacinta al la Dukino bonegan korbon da prunoj! Vere interesa historio.

Tiu ĉi anekdoto pruvos en nova maniero, la utilon, kiun donas kono de Esperanto.

## BULONJO.

H. Bolingbroke Mudie.

La longe atenditaj Pentekostaj tagoj fine estas alvenintaj. Sed kia vetero! Ĉie troviĝas nigraj nuboj kaj pluvegtoj, kaj la suno tute forĝesis nin. Kurage!

Ni baldaŭ trovis, ke ni eniris Esperantujojn, ĉar, dank' al la senĉesaj klopodoj de nia Libertempa-Kapitano Sro. Reeve, kaj al la afableco de la fervoja kompanio S.E. & C.R. ni trovis por ni apartigitan vagonon. Tie ni enŝlosiĝis, por senhalte paroladi Esperante kaj esperante, ĉar ni ja esperis, ke la vetero baldaŭ pliboniĝus.

Laŭ la anonceto en THE ESPERANTIST, No. 7, areto da Anglaj Esperantistoj estis forironta Bulonjon. Ni estis tiu areto, kies partoprenantoj nombris dek-du.

Gustatempe la tre, tre longa turist-plenigita vagonaro forveturis, kaj alvenis Folkestonen, kie la maro estis sufiĉe trankvila kaj ni sensancele eniris la vaporsipon.

Unu el la areto havis apartan kajuton tie, kaj ni Esperantistoj multe ŝatis la privilegion ĝin uzi. Vere, ĉiam kaj ĉie Esperantistoj ĝuas specialajn privilegiojn.

Ni supozis, ke ni movadis sur la maro, sed, pro la nebulo, la ĉirkaŭaĵoj estis preskaŭ nevideblaj. Fine la kruta Franca marbordo aperis tra la griza nebulo, kaj ni rapide kolektigis pakaĵojn, k.t.p., por ke ni povu tuj konatiĝi kune kun niaj jam konataj sed neniam viditaj samideanoj. Sed ni eraris pri tio. Ne estis necese atendi ĝis kiam la ŝipo ĉesus sian movadon ĉar, alproksimiĝinte, ni ĝoje rimarkis ke la elŝipejo estis de granda verda steletaro okupata. Kaj niaj kunbatalantoj rimarkas samon ĉe ni, kaj tuj elkriegas per fortaj voĉoj tre korajn eldirojn. La steletoj intersalutas. "Vivu Esperanto! Kiel vi sanas? Ĉu la maro estis trankvila?" Tiuj kaj similaj demandoj ĝoje flugis de la tero en la ŝipon, el Francujo en Anglujojn.

Kompreneble la ĉirkaŭstarantoj multe miris pri tio. Kaj kia lingvo! Mi ja konas ĝin sen ellernado, unu el ili rimarkis al mi. Sed Esperanto havis bonajn reklamojn dum la tuta tago tie. Baldaŭ alvenis la tempo kiam ni povis premi la manojn de niaj kunstudentoj, kaj kune eniri por submetiĝi sub la linkaj okuloj de la limdepaĝistoj.

Ni vidis malfeliĉulojn, kies cigarojn oni forprenis, sed ni estis feliĉuloj, ni estis Esperantistoj, kaj tiaj neniam pekas.

La Brita Konsulo aldonis sian bonvenon al tiu de niaj Francaj amikoj, kaj nia akcepto vere estis korega. Sur la muroj de la limdepagejo troviĝas

prezaro Esperanta. Tio ĉi certe estas bona reklamo por la lingvo. Ni do tuj sentis, ke ni ne estis venintaj en alian landon, sed ke la verda Esperanta standardo ankoraŭ ĉie regnis.

Baldaŭ ni, granda procesio, marŝis sur la stratoj de la plej grava centro de la Franca fiŝkaptado. La maro ĉiam troviĝas je unu flanko ĉi tie, sed vere, kiam ni alvenis, maroj ĉie vidiĝis, pro la pluvego, kiu ĉion ŝanĝigas.

Post tre mallonga promeno, ni alvenis al la hotelo *Castiglione*, kies estro estas Esperantisto, kaj tie ni oficiale prezentigis al niaj novaj, pro ni malsekigitaj, amikoj.

Dum tiu ĉi ceremonio, unu el ni serioze diris: "Mi estas la subestro de la vetero. Mi aranĝis la pluvon, por ke la vagonaro ne estu tro varma kaj homplena. Nun mi aranĝos bonan veteron, por ke ni, kaj ĉiuj aliaj kuraĝuloj, ĝuu feliĉan libertempon." Kompreneble ĉiuj multe ridis, je tiu ĉi eldiro, kaj iu rimarkis, ke eble li nur estis tre suba estro. Tamen, de tiu momento, la pluvo ĉesis, la stratoj sekigis, kaj fine la suno ekbrilis por aplaŭdi tiun ĉi memorindan internacian kunvenon.

Post tagmango, ni faris promenadojn en la urbo, vizitis la fiŝvendejon, la ŝipejon, la antikvajn urburojn kaj la katedron. Tiam, reveninte hotelen, ni pretigis nin por vespermango.

Al tiu momento, Sro. Michaux, la tre sindonema Prezidanto de la Grupo, sendigis al mi la plej bonan urbfotografaron iam vidita, kaj, ĉagrenege mi ĝin konfesas, mi forĝesis danki lin pri tio. Eble, je tiu ĉi okazo, li afable forĝos la proverbon ke *malfrua danko estas pli malbona ol danko ia*, kaj akceptos miajn nunajn dankojn. Kaj, se iatempe kiam la Grupanoj rekunveniĝis, ili bonvolos skribi por mi siajn subskribaĵojn sur papereron, mi havos grandan plezuron enmeti ĝin en la albumon, kiun mi ĉiam konservos inter mia ĉiam pligrandiganta propagandilaro.

Dum la vespermango ni nature priparolis la venontan kunvenon, kies programon ni jam vidis sur la paĝoj de la "*Cicerone*" (Semajna Bulonja organo, ĉiam enhavanta Esperantan paĝon).

Sed, kvankam ni multe antaŭigis la proponaĵojn, la kunveno mem donis al ni nepripenseblan plezuron. Oni komencis iom post la naŭa horo, kiam ni eniris belan ĉambregon, mirinde ornamigita de Francaj kaj Anglaj flagoj, kaj ankaŭ de ĉiam verdaj arbetoj kaj palmoj. Vere ŝajnis, ke ni estis enirintaj en Kristnaskan festejon.

Sed la okuloj ne estis la solaj membroj, kiuj guis tiun akcepton. Ankaŭ la oreloj multege

ŝatis la koran honon: "Dio savu la Reĝon" ("The Esperantist," No. 1) kiu donis komencan al la bonega programo.

Estas tute neeble priskribi tiun ĉi kunvenon detale, sed eble la programo estos interesa por legantoj. Jen estas:

## PARTO I.

|                                |                                     |
|--------------------------------|-------------------------------------|
| <i>Dio savu la Reĝon</i> ..... | <i>Ĥoro.</i>                        |
| <i>Prezentado</i> .....        | <i>Sro. Michaux.</i>                |
| <i>Valso Esperanto</i> .....   | <i>Fno. Decrey.</i>                 |
| <i>L'Espero</i> .....          | <i>Sro. Boulet.</i>                 |
| <i>Mia Mano</i> ... ..         | <i>Fneto M. T. Bergier.</i>         |
| <i>Bonan Tagon, Suzo!</i> ...  | <i>Sro. Derveaux.</i>               |
| <i>La Paco</i> .....           | <i>Sro. Dufeutrel.</i>              |
| <i>Duo de la Reĝo d'Ys</i>     | <i>Sno. Bergier kaj Fno Sutils.</i> |

## Honora Vino.

|                               |                       |
|-------------------------------|-----------------------|
| <i>Piana-ludo. L'Akvofulo</i> | <i>Fno. Pannevin.</i> |
| <i>13a, Hungara Rapsodio</i>  | <i>Fno. Decrey.</i>   |

## PARTO II.

|                                  |                                   |
|----------------------------------|-----------------------------------|
| <i>Floreto</i> .....             | <i>Fneto G. Bergier.</i>          |
| <i>La Cigalo kaj la Formiko</i>  | <i>Fneto M. T. Bergier.</i>       |
| <i>La Korvo kaj la Vulpo</i> ... | <i>Fneto Lephay.</i>              |
| <i>Lasta Deziro</i> .....        | <i>Fno. Sutils.</i>               |
| <i>Hamleto</i> .....             | <i>Sroj. Dufeutrel kaj Mudie.</i> |
| <i>Hispana Romano</i> .....      | <i>Sino. Bergier.</i>             |
| <i>La Bano de la Pastro</i> ...  | <i>Sro. Boulet.</i>               |
| <i>Galateo</i> .....             | <i>Sro. Derveaux.</i>             |
| <i>La Marseja Himno</i> .....    | <i>Ĥoro.</i>                      |

## Bonvena Ĉampana Vino.

Vere, tre memorinda programo. Kaj, se oni demandus kian eron mi pleje ŝatis, mi estas certa ke la plenkreskuloj min pardonos, kiam mi konfesos ke mi pleje ŝatis la kvar recitadojn de Fratlinetoj Bergier kaj Lephay. Kiam oni aŭdas nian karan Esperanton el la lipoj de kvin, sep kaj dekjaraj infanoj, ĝi havas ankoraŭ pli belan sonon ol kutime. Kaj oni devas ankaŭ gratuli—ĉiujn! Ĉio estis bona, eĉ bonega. Tamen estis unu afero kiu ne tute plaĉis al mi.

Eble ĝi estas nur bagatelo, sed mi ja opinias, ke ĝi meritas gravan atenton. En almenaŭ unu el la belaj kantoj, mi rimarkis, ke la tradukinto ne konservis la Esperantan akcenton.

Laŭ mia opinio, bona Esperanta kanto devas konservi tion ĉi, kaj oni ne devas meti la akcenton sur silabo alia ol la antaŭlasta. Se oni atente tralegos la tradukojn de Tom Bolin' (No. 5) Vivo de Maristo (No. 1) kaj aliaj tradukoj de bone konataj poemoj en THE ESPERANTIST oni konstato ke, eĉ por la kutimita melodio, kiun oni verkis por tiuj ĉi poemoj, la Esperantaj vortoj taŭgas. Mi do esperas ke, kiel eble plej multe, niaj muzikaj verkistoj provos konservi la uniforman Esperantan akcenton, sen kio nia lingvo perdis tiom da utileco kaj belsoneco.

Post la finiĝo de la unua parto, du infaninetoj prezentis belegajn floramanojn al la du Anglinoj, kiuj estis inter la vizitanta areto: belaj Esperantaj floramanoj. Mi intence diris *Esperantaj*, ĉar ambaŭ el ili konsistis el floroj ruĝaj, blankaj kaj bluaj; Anglujo kaj Francujo; kaj interplektita estis la bela Verdo de la Espero, la emblemo de Internacieco.

Sed jam tro longa estas tiu ĉi priskribo. Por ĝin fini, mi rimarku pri la bonegeco de la paroladoj faritaj de SROJ. Michaux kaj Reeve.—Sed ne! Ekzistas ankoraŭ alia afero, kiu eble havas apartan intereson por Vi, karaj Legantoj. Oni ĉie rimarkis, ke la *Verd-kovrilajeto* estis tre leginda. Dankojn, Bulonjaj Legantoj! Ju pli granda la laboro, des pli granda la plezuro kiam oni lernas, ke la rezultatoj estas ŝatataj. Se nur la tuta legantaro kunpensus!

Tre, tre laca, ni fine realvenis en nian komfortan hotelon, por silente pripensi la mirindan tagon, matene en nigreta, malseka Londono, posttagmeze en nuba, malseketa Bulonjo, kaj vespere en belega, varma Esperantujo, inter la floroj, kantoj kaj salutoj de karaj internaciaj amikoj.

Morgaŭ matene, post naŭ-tridek, niaj amikoj nin serĉis, kaj kondukis en la ĝardenojn de Sro. Duhamel, la Esperantista floristo Bulonja, kaj tie ni fotografiĝis antaŭ bela floraro. La rezultato estas bona, kaj ĉiam servos kiel fidela memoraĵo de plezura mateno.

Posttagmeze ni eniris en tramon (niaj dek du anoj kaj la francaj amikoj plenigis la veturilon) kaj komencis gajan veturon ĝis Wimereux. La antaŭan nokton mi estis rimarkinta verdan rubandon sur la fortepiano, kiu portis oreskribitan ESPERANTO. Tiun ĉi rubandon oni nun fiksas ĉe la vitro de la tramo, kaj ĉiuj preterirantoj bone rimarkis, ke ĝi estis Esperantista tramo. Tiamaniere la Afero gajnis bonan reklamon.

Mi jam ekpensis, ke oni min trompis sed tiam, kiam unu post la alia, mi rimarkis novajn vidindaĵojn mi certigis, ke estis ja fakto. Bulonjo ne estas malbela urbo, kaj la kamparo ankaŭ estas sufiĉe bela. Ne ŝanceliĝu, do, Anglaj adeptoj, sed tuĵ vizitu la belan hejmon de tiom da fervoraj Esperantistoj.

Sur la beleta marbordo Wimereuxa ni ĝuis tre feliĉan posttagmezon. La suno jetis sur nin ne tro varmajn radiojn, kaj la plimulto da la kunvenintoj sidigis sub la ombro de la verda rubando por kunkanti kaj ŝercadi. Sed mi ne estis tiel mallaborema, kaj ĝuis tre plezurigan ludadon kun la ĉarmaj infanoj, kiuj venis kune kun ni. Kaj, Legantoj, estas terura sed vera fakto, ke, en Francujo, eĉ la infanoj parolas France! Tamen ludoj kaj Esperanto ĉiam estas internaciaj, kaj ni estis tre feliĉaj, kaj multe bedaŭris kiam verperigis,

kaj ni devis returnen trami. Post vespermanĝo, ni denove kunvenis, kune kun niaj gastamaj amikoj en la ĉefloko de ĉiuj Francaj urboj, la *Casino*. Tie, sidante en la belaj ĝardenoj apud la lumigita estuario, sub la hela lunlumo, Sro. Boulet (kiu venis el Roueno) afable promesis fariĝi nova kunverkanto, kaj ni hodiaŭ povas legi lian lertan *Calabre* tradukon.

Jen alia gajno por *Mondvaganta Redaktoro*! Li ricevas artikolojn de tiuj, kiuj li havas la plezuron renkonti. Kaj, ĝis nun, mi kredas, mi estas la sola mondvaganta Esperanta Redaktoro. Tial Vi estas povintaj legi multe da interesaj rakontoj, kiuj multe helpis je la sukceso de tiu ĉi Gazeto.

La proksiman tagon, post matenmanĝo, ni ĥore estis kantantaj *Funiculi Funicula* kiam niaj nelacigeblaj samideanoj venis por konduki nin en Le Portel.

Kia belega sablaro tie troviĝas. Ebena kaj malmola kiel asfalto. Bonega loko por la krevetkaptado, sed, ŝajne, Esperantistoj en Bulonjo neniam havos tempon por tiu ĉi agrabla amuzado. La tieaj amikoj ĉiam sukcesos trovi ian novan kaj interesan vidindaĵon.

Sur tiu ĉi sablaro ni denove faris ludojn kaj kursojn, kaj, fine alvenis al la interesa vilaĝo. Le Portel estas enloĝata de fiŝistoj, sed Wimereux, je la alia flanko de la estuario estas rapide pligrandiganta ĉirkaŭurbo de Bulonjo.

En Le Portel ni vidis interesan sed funebran procesion: la enterigiron de fiŝisto.

Sro. Michaux diris al mi, ke multe da la tieaj loĝantoj ankoraŭ posedas la trajtojn Hispanrasajn, ĉar siaj praaŭoj venis el tiu suda lando.

Sed mi jam trolongigis tiun raporton! La tramo rekondukis nin en Bulonjon, kaj oni aranĝis finan posttagmezan promenadon ĝis la rimarkinda monumento de la *Grande Armée* Napoleona. Tiu ĉi estis tiel ŝatinda, kiel la aliaj, kaj la vetero ĉiam estis bela. Tamen oni diris, ke en la apudaj vilaĝetoj estis iom pluvdona. Ni estis feliĉuloj havi kune kun ni la veter-subestron!

Dum la promeno ni preparolis la proponitan kunvenon Esperantistan, pri kio mi esperas skribi ion poste. Tiaj kunvenoj estas la plej bonaj aferoj por vekigi kaj revekigi intereson pri nia afero.

Post tre feliĉa haltado en arba valetto, kie ni

denove fotografiĝis, kaj ludis kun la infanoj, ni kune revenis por fari la pakajojn por la baldaŭe foriranta vaporŝipo. Tion farinte kaj vespermanĝinte, niaj fervoraj amikoj akompaniis nin ĝis la enŝipejo por doni al ni lastan *Ĝis la Revido*.

Dankojn, dankojn, novaj sed tamen tre malnovaj amikoj. Dank' al vi, ni ĝuis mirindan viziton; dank' al vi, ni nun havas eĉ pli varman estimon de nia kara lingvo, kaj ĝiaj afablegaj Francaj adeptoj. Unu el nia aro estis Franca Anglano, kaj li miregis pri la tutkoreco de nia akcepto de siaj samnacionoj. Vere ni ŝajnis esti "centjaraj amikoj!"

Kaj ĉu mi ĉiam facile komprenis la alilandulojn? Ne estas dubeble, kaj ne estas dubinde!

Tamen unu malfacileco ĉiam troviĝis, pri tio ni devis esti singardemaj. Jen. Ĉiam, kiam oni aranĝis estontan renkonton, oni devis precipe zorgi pri la maniero por esprimi la horon. Ĉiam Sro. Michaux diris ambaŭ, ekzemple, je la *naŭ kaj duono* KAJ je la *duono de la deka*. Sed mi, kaj miaj Francaj amikoj kunsentas, neniam plu diros aŭ unu aŭ la alian. Ni diros je *naŭ-tridek*. Tiamaniere ne estos eble, ke ni manku niajn renkontojn pro eraro kaŭzata de tiu malfacileco.

Al la dirita horo, ĉiam aldonu la minutojn, kaj jen sistemo jam internacia por diri la horon. Laŭ la antaŭa anonco en *THE ESPERANTIST*, tiu ĉi sistemo estas la fervoja (kaj sekve la praktika) uzo.

Kaj Vi, karaj Legantoj, kiu legis tiujn ĉi liniojn, kion vi pensas? Ĉu vi ne multe bedaŭras, ke vi ne kuraĝis partopreni je tiu ĉi unua oficiala grupkunvenejo? Mi ĝin esperas. Tamen, ne estas necese, ke vi longatempe plendu pri tio. Nia Libertempo-Kapitano, Sro. Reeve nun klopodas pri nova vizito al la Grupo en Havro. Mi jam konas tiujn ĉi fervorajn amikojn de nia afero, kaj mi esperas ke, je la 30a & 31a Julio kaj la Aŭgusto, ili ricevos viziton de granda aro da alilandaj, Esperantistoj, ne el Anglujo nur, sed el ĉiuj proksimaj aŭ malproksimaj landoj. La elspezo ne estos granda, kaj se tiuj, kiuj povos tien iri, tuj skribos al Sro. Reeve (63, *Effingham Road, Lee, Kent*) li povos aranĝi specialajn kondiĉojn kun la fervoja kompanio L. & S.W.R. kaj neniu povos plendi pri la rezultato.

"*Vivu Esperanto, kaj Vivu la Esperantistoj!*"

## LA LINGVO DE LA FLOROJ.

Originale verkita de Ben Elmy (Daŭrigata de paĝo 79).

### PARTO II.

Ju pli ni studas la florojn, des pli ni konstatas, ke multe da ili posedas nesuspektitajn lertecojn, kiujn apud besto ni volonte nomus instinkto aŭ eĉ prudento. La esploradoj kaj eksperimentoj de la

plimultiĝanta anaro de observistoj pruvas tion ĉi. Tamen, ĉar la kreskaĵoj aŭ floroj estas mutaj, tial la homaj oreloj neniel taŭgas por tiu esplorado; estas do necese, ke la homo uzu siajn okulojn des pli zorge kaj akurate. Eĉ tiam, multe da floraj okazaĵoj evitas la tro difektan homan vidlertecon,

homa difekto kiun la homo mem tre ofte forgesas kaj malatentas.

Ekzemple, oni diras ordinare, kune kun Darwin, ke "la kreskaĵoj kompreneble ne posedas nervojn, nek centran nervosistemon."<sup>(1)</sup> Sed tiamaniere, fariĝas ankoraŭ pli mirinda la plua eltrovo, ke iafoje "kreskaĵo ekscitita transigas la influon al aliaj partoj de si, kaj tiuj ĉi partoj reciproke ekmoviĝas."<sup>(1)</sup> Kia do estas la agometodo de tiaj procesoj? Se la kreskaĵo "kompreneble" ne uzas nervfadenojn por telegrafi siajn sentadojn kaj ordonojn, ĉu eble ĝi komunikigas inter si per "senfadena" telegrafo? Vere, tre nescia estas la homo, eĉ ĉe la dudeka centjaro!

Tre miriga ankaŭ estas la fenomeno de la perioda dormo de folioj kaj floroj, kun iliaj akompanantaj movadoj. Ankoraŭ mirindega estas, ke, kiel la mambesto produktas albumenan sukeran lakton, tiel la kreskaĵo produktas sukeran mielon en la floro, kun amelon kaj eĉ albumenon en la semo, por nutri la embrion kaj la junan estontan kreskaĵon.

Cetere Darwin skribas: "Apenaŭ estas trograndigo diri, ke la radikpinto (de kreskaĵo), tiom sentema, kaj tiel reguligante la movadojn de la apudaj partoj, agadas tute kiel la cerbo de malsupera besto."<sup>(1)</sup> Sed certe, oni povas plivole demandi ĉu la agadoj de kelkaj floroj ne superas eĉ iajn funkciadojn de tia besta cerbo.

Rilate al tio ĉi, Dro. J. E. Taylor argumentas pri "psikologio kreskaĵa," kaj li tre racie inspiras, ke "ĉe proksime estonta tempo ni eble konstatos, ke ne ekzistas vivo sen sekva PSIKOLOGIA agado; ke tio ĉi estas nepre rezultato de tio; ke la vivo mem estas kondiĉita per psikologia agado; ke iaj kreskaĵoj posedas la ekvivalenton de besta instinkto, la ebleco gajni individuan sperton, kaj ĝin transigi al iliaj posteuloj, por ke tiuj ĉi profitu, ne tute nekonscie."<sup>(2)</sup>

La Amerikana poeto, Lowell, evidente kredis je tiu psikologio, ĉar li aligas al floroj ne sole vivon, sed ankaŭ animon—

"Jen ĉia terbulo, al viv' puŝigante  
Pro alta instinkto, interna fervor',  
Kaj supren blinde ĝis lum' palpetante,  
Atingas animon per herbo kaj flor'."<sup>(3)</sup>

Tiel ankaŭ la Angla poeto, Shelley, ĉe "La Sentema Kreskaĵo," parolas pri la gracia kortuŝeco de la interna "io, kvazaŭ spirito" de tiu floro. Aliloke li remarkas, eĉ apud pli humila kreskaĵo, la influon viveman de la aero kaj de la lumo, tuj fariĝontaj—

"Korbatoj nevideblaj de la flor',  
Al ĉiu parto vivon pulsigantaj."<sup>(4)</sup>

Kiam nutro nin vivigas,  
Aŭ bonaj' ajn nin ĝojigas,  
Ni memoru, ke ni devas  
Esti dankaj, ĉar ni scias,

Alia Amerikano, la glora Wult Whitman, rakontas—"Karesante mi tenas branĉojn aŭ junajn arbojn—mi tuj sentas iliajn sukcon kaj tendendon levigantajn en mi, kiel hidrargo ĉe varmeco. Mi baraktas amike kun ilia senkulpa fortiko—mi scias ke iom da ĝia virto pasas de ili al mi. Eble ni reciproke intersanĝas ion—eble la arboj rekonas ĉion tion pli ol mi iam pensis."<sup>(5)</sup>

Preskaŭ idente sciigis Richard Jefferies—"Tiu aliformiĝo de buloj kaj malvarma materio en vivajn objektojn, faras la ĝojon kaj esperon de la somero. Ĉiu tronketo de herbo, ĉiu folio, ĉiu individua floro kaj folieto, parolas pri espero. Konsideru la herbojn, la kreskaĵojn—ili estas signoj de tero alligante ĝis la vivo, antaŭ niaj okuloj. Tial al mi estas la floroj tiom pli ol nur trunketo kaj folieto. . . . La blankaj folietoj alvokas rekte al nia koro; la trankvilaj kverkoj estas plenaj je mistero. La floroj, per siaj mil vizagoj, kolektis la kisojn de la mateno. Ilin ŝatante mi ricevas almenaŭ iom da ilia vivopleno—novan penson el ĉiu folieto."<sup>(6)</sup>

Certe, nia kara Jefferies multe aŭskultadis—kaj iom komprenis—la veran lingvon de la floroj! Tion ĉi ankaŭ atestas siaj ĉarmaj verkoj "Bevis," "La libera Aero," kaj la interesa, pretervorte laŭdinda, "Historio de Mia Koro."

Tamen bezonas konfesi, ke ne ĉiuj floroj tiom aminde prezentigas kontraŭ la homoj kaj bestoj, aŭ eĉ kontraŭ ĉiaj aliaj specoj de floroj. Inter ili ja estas amikoj kaj malamikoj, reciproke helpantaj aŭ malhelpantaj. Tion ĉi precipe klarigis Dro. Taylor, en sia verko supredirita. La vero estas ke, kiel apud la bestoj, tiel ankaŭ apud la floroj, efektiviĝas pli aŭ malpli la postuloj de "la barakto je ekzistado," "la natura elokto," kaj "la postdatiĝo de la plej konvenaj je la okazoj." Estas, do, nur malklera konkludo, ke la floroj "nek laboras, nek ŝpinas"; la vivotempo de la floroj estas tiom plene (kaj almenaŭ tiom utile) okupata, kiom tiu de la bestoj. Plie, estas ja la penado de la kreskaĵoj kiu provizas ultimate la nutraĵon mem de ĉiu besto, de ĉiu homo; tial, tiu ĉi devas memoriĝi ke de la vivo kaj laboro de la kreskaĵoj, sia propra vivado dependas.

Amikaj floroj, kiel malmulte ni komprenas vian vivon, vian lingvon!

Ĉe la kreskanta homa pensado, nia kompreno ĉiam fariĝos pli klara, kaj nia amo pli forta, je la plej telaj el la infanoj de la tero—la mutaj sed elokventaj floroj.

<sup>1</sup> El "The Movements of Plants." <sup>2</sup> The Sagacity and Morality of Plants. <sup>3</sup> The Vision of Sir Launfal. <sup>4</sup> The Zucca. <sup>5</sup> The Oaks and L. <sup>6</sup> The Pageant of Summer.

Ke aliaj homoj penas  
Por ben' kiun ni ricevas:  
Ne forgesu ni gefratojn  
Bonfarintajn nekonatajn. (6266).

## LA "ATESTO PRI KAPABLECO."

Originale verkita de G. D. Buchanan, 8820.

Inter la rimarkoj kiuj aperis sub la titolo de *Correspondence Notes*, en la lasta numero de nia Gazeto, estis mallonga paragrafo, kiu diris, ke tiuj Britaj Esperantistoj kiuj dezirus akiri nepran pruvon pri sia plena sciado de nia helpa lingvo devus sin turni al la *Franca Societo por la Propagando de Esperanto*, por ricevi ĝian konatan *Atesto pri Kapableco*. Kvankam ni ĉiuj multe ŝatas la fratan spiriton de niaj Francaj amikoj, tamen ni esperas, ke post nelonge ni povos aranĝi ekzamenojn por Brita *Atesto* laŭ simila modelo. Respondante al la afabla propono de nia Redaktoro, mi traktos mallonge pri tiu ĉi afero, esperante, ke la konsilo de pioniro eble estu helpa al estontaj kandidatoj.

Kompreneble, la aspiranto devas jam posedi bonan ĝeneralan sciadon de la fundamentaj principoj de la lingvo antaŭ ol li komencos la specialan preparadon por la ekzameno. Se li estus tiel feliĉa kompreni plenege la Francan lingvon, li elektu fari tiun ĉi ekzamenon France; sed nur adepto devus atenci tion ĉi. Se, tamen, simile al mi, li konus nur sian nacian lingvon, li ne povos ĝui la helpon de tiaj valoraj lernolibroj kiaj *La Commentaire sur la Grammaire Esperanto* kaj *La Texte Synthétique*.

Mi persone konstatas ke la *Esperanta Sintakso*, de Dr. Paul Fruictier, estis preskaŭ necesega, kaj mi ĝin forte rekomendas. Se la studento povas verki kune kun amiko, tiom pli bone. Mi mem ŝuldas multon je la inspiradoj kaj konsilo de klera amiko, kun kiu mi ofte korespondas.

Fininte sian preparadon, la studento devas tiam skribi al *Sro. Edouard Bréon*, 6, *Rue du Levant, Vincennes, près Paris*, klarigante ĉu li volas fari la ekzamenon France aŭ Angle. Post malmultaj tagoj li ricevos plenan sciigon pri la oficiala programo.

Se la aspiranto elektus fari la ekzamenon Angle, estos necese ke li traduku Esperantan eltiraĵon Anglen, kaj Anglan eltiraĵon Esperanten. La "Demandaro" enhavos serion da gramatikaj demandoj kaj ekzercon pri Esperanta elparolado. Por reprezenti tion ĉi, mi uzis la bonegan fonetikan metodon kiu aperis sur paĝo 25, Nro. 2 de THE ESPERANTIST.

Skribinte al nia Samideano, *Sro. Mann*, de Paris, por ricevi lian opinion pri la speciala preparado por la ekzameno, mi ricevis la jenan valoran respondon.

## THE CERTIFICATE OF MERIT.

G. D. Buchanan, No. 8820.

Among the remarks under the heading *Correspondence Notes*, in the last number of our *Gazette*, was a short paragraph which stated that those British Esperantists who desired to acquire an indisputable proof of their thorough knowledge of our auxiliary language must apply to the *French Society for the Propagation of Esperanto*, in order to obtain its well-known "Atesto pri Kapableco." Although we all greatly appreciate the fraternal spirit of our French friends, we nevertheless hope that ere long we shall be able to organize examinations for a British Certificate on similar lines. In reply to the kind suggestion of our Editor, I will briefly treat of this matter, in the hope that the advice of a pioneer may possibly be a help to future candidates.

Of course, the aspirant must first possess a good general knowledge of the elementary principles of the language before he begins the special preparation for the examination. Should he be so fortunate as to understand French thoroughly, let him elect to undergo the test in French; but only an adept should attempt this. If, however, like myself, he should know only his own national language, he will not be able to enjoy the help of such valuable text-books as *La Commentaire sur la Grammaire Esperanto* and *La Texte Synthétique*.

Personally I have found that the *Esperanta Sintakso*, by Dr. Paul Fruictier, is almost essential, and I recommend it strongly. If the student can work with a friend so much the better. I owe much to the suggestions and advice of a well-informed friend, with whom I often correspond.

Having concluded his preparation, the student must write to *M. E. Bréon*, 6, *Rue du Levant, Vincennes, near Paris*, stating whether he purposes taking the examination in French or English. In a few days he will receive full details as to the official programme.

Should the candidate choose to go up for the examination in English, it will be necessary for him to translate an Esperanto extract into English, and an English extract into Esperanto. The list of questions will contain a series of grammatical points and an exercise on Esperanto pronunciation. In order to illustrate the latter, I employed the excellent phonetic system which appeared on page 25 of THE ESPERANTIST, No. 2.

Having written to our Friend-in-Esperanto, *Mr. Mann*, of Paris, to learn his opinion with regard to special preparation for the examination, I received the following valuable reply:—



“Pri plej efika kaj sukcesiga metodo studi por la ekzameno, mi rekomendus, post ellerno de la *Complete Text-Book*, zorgan legadon de *Hamleto* kaj *Fundamenta Krestomatio*, kun *Esperanta Sintakso*, de Fruictier. Ekzemple, oni prenu en *Krestomatio* iun anekdoton. Legu ĝin du aŭ tri fojojn laŭvoĉe. Poste, oni faru al si diversajn demandojn per vortoj tiaj kiaj Kiu (n), Kies, Kie (n), Kiel, Kial, Kiam, Ĉu? Por varii, oni rediru la anekdoton je aliaj tempoj ol tiuj donataj en la teksto mem. Ekz., la teksto eble rakontas la aferon, kiel okazinta je iu tempo pasinta. Nu, la ekzercanto povus rekonstrui la anekdoton, metante la serion da agoj en la pasantan tempon, AS, aŭ en la pasontan tempon, OS; poste en malsimplajn tempojn: Estis . . . inta (j), k.t.p. Tiamaniere la studo fariĝas vere interesa, kaj la lernanto tre baldaŭ elposedos la gramatikon tre simplan de Esperanto.

“Alion oni povas ankaŭ fari kun bonaj rezultatoj. Per la helpo de la vortaro *Angla-Esp.*, oni povas ekzerci sin jene. Oni povas, dum la farado de agoj iaj, nomi ilin Esperante. Ekz. Levigante, fru— (aŭ malfru—) matene, nomu la serion da agoj. Mi levigas, mi stariĝas, mi surtiras miajn ŝtrumpojn, k.t.p. Mi estas vestita (mi estis vestota). Mi lavas min, mi matenmanĝas, mi laboras, k.t.p. Ĉiuj ĉi agoj estas analizeblaj kaj etondeblaj, kaj liveras tre interesajn imagajn konversaciajn kaj gramatikajn ekzercojn.

Tio estas la fama Gouin'a metodo studi lingvojn; ĝi donas mirigajn rezultatojn. Tiamaniere, la vortoj kaj esprimoj restas en la memoro, kaj oni ne laciĝe lernas *page* novajn vortojn. Kaj por konversaciaj klasoj tia procedo estas praktikinda, ĉar ĝi ŝparas la tempon kaj koncentras la pensojn de la ekzercantoj. Soj. George Phillips & Son, Ltd., 32, Fleet Street, London, eldonas tre interesan kaj pensigan serion da libroj verkitaĵ laŭ la Gouin'a metodo.

N.B.—Estas preskaŭ certe ke, post nur iom da tempo, la deziro de tiom de adeptoj estos plenumataj, kaj Brita Ekzameno fondiĝos. Oni nun klopodas pri la afero.—(RED.).

“As for the most effective and successful method of studying for the examination, I should recommend, after mastering the *Complete Text-Book*, a careful reading of *Hamlet* and *The Fundamenta Krestomatio*, with *Esperanta Sintakso*, by Fruictier. For example, take some anecdote from the *Krestomatio*. Read it two or three times aloud. Then ask yourself various questions by words such as *Who (m)*, *Whose*, *Where (Whither)*, *How*, *Why*, *When* . . . . To vary the study repeat the anecdote, using tenses other than those employed in the text itself. For example, the text possibly narrates the matter as having happened at some past time. Well, the student could remodel the anecdote, placing the concatenation of events in the Present AS, or in the Future OS; and afterwards in the compound tenses: *Estis . . . . inta (j)*, k.t.p. In this manner the study really becomes interesting, and the pupil will very soon master Esperanto's very simple Grammar.

One can also adopt another course with good results. With the aid of the *English-Esperanto Dictionary* one can train one's self as follows. While performing any actions one can name them in Esperanto. Thus, getting up early (or late) in the morning, enumerate the series of actions. I get up, I stand up, I put on my stockings, etc. I am dressed (I was about to be dressed). I wash, I have breakfast, I work, etc. All these actions can be analyzed and extended, and supply most interesting imaginary conversations and grammatical exercises.

That is the famous Gouin method of studying languages; it gives remarkable results. Thus words and expressions are preserved in the memory, and one does not wearily learn new words parrot-method. And such a system is practicable for conversational classes, as it saves time and concentrates the thoughts of the pupils. Messrs. George Phillips & Sons, Ltd., 32, Fleet Street, London, publish a very interesting and thought-inspiring series of books compiled on the Gouin system.

N.B.—It is almost certain that in a short time the wishes of so many adepts will be fulfilled, and a British examination will be founded. The matter is now under consideration.—(THE EDITOR).

La Onklino diris al sia nevino: “Ne ploru, karulino, aŭ ci malbeliĝos.”

“Ĉu vi multe estas plorinta, kiam vi estis juna?” respondis la infanino.

(P de B).

## DUA ORIGINALA SKIZETO, VERKITA DE E.W.

## Nia Fraŭlino.

Ŝi loĝis en dometo, tute apud la domego ĉirkaŭfosigita de ŝiaj praavoj. Ĝi nun apartenas al fremdulo, sed li ne estis vizitata de la sinjoroj de la departemento, kaj estis malestimata de la vilaĝanoj. Li do lasis neokupata sian antaŭ ne longe aĉetitan domon.

Nia Fraŭlino estis, tiel, kiel ŝia frato, la *pacama Pastro* (pri kiu mi skribis en THE ESPERANTIST, No. 8) tre granda, sed ŝi estis rekta kaj tre aktiva. Ŝi havis brunajn okulojn, aglan nazon, firman mentonon kaj voĉon kiu neniam estis laŭta, kvankam ofte soverega.

Unufoje Dimanĉe ŝi ĉiam sidis simple vestita, kune kun sia nevino kaj tri servistinoj, sur la plej granda preĝbenko de la paroĥa preĝejo. La Diservo finita, ŝi venis al ŝia pordo, kiun malfermis la paroĥestro, kiu kolegia ĉapo en la mano, salutis ŝin profunde.

Ŝi respondis je solena reverenco: tiam li sekvis ŝin kaj ŝiajn nevinojn al la pordego. Kiam ili ekstere alvenis, la aŭdintaro eklasis siajn benkojn. En bela vetero *Nia Fraŭlino*, ĉar tiel ŝi nomiĝis ĉiam, kutimiĝis iri sub granda arbo en la preĝejkorto, kaj tie staris aŭ sidis dum la vilaĝanoj kunvenis por demandi al ŝi kuracilon aŭ konsilon; por preparoli ian disputon, je kies merito ili deziris, ke ŝi aljuĝu; aŭ por peti, ke ŝi ordonu la punon por ia eltrovita krimeto. Ŝiaj decidoj neniam estis disputataj, ĉar la Galoj havas ankoraŭ superstiĉan kredon je la saĝeco kaj sankteco de maljuna virgulino, se ili scias, ke ŝi estas fraŭlino de ŝia propra elekto.

La junularo de la vilaĝo amis kaj respektis sian Fraŭlinon; ankaŭ ŝi amis ilin, precipe tiujn, kies gepatrojn ŝi konis dum ilia juneco. El tiuj ĉi, la plej de ŝi amata estis la beleta, dolĉa dekokjara Nest. Ŝi ĝuis rigardadi la knabinon sidante inter la ĝehoristoj apud ŝia fianĉo, kiu estis lerta kaj inteligenta frizisto el la proksima urbo. Ŝi sciis ke ŝi jam aĉetis multe da utilaj ornamoj, trikotaĵoj kaj fajencoj por la estonta domo de Nest—la domo en kiun, post unu aŭ du jaroj, la fianĉino estos kondukata kun la eksplodo de du aŭ tri cent pafletoj, kun la piedfrapado de cent kvindek ĝis ducent ĉevaloj kaj azenoj, kun la kantoj, kriegoj kaj koraj gratuloj de kvin aŭ ses cent homoj, ĉar la familio de Nest estis granda, kaj tre respektinda en tiu loko.

Unu Dimanĉon, *Nia Fraŭlino* vidis Nest inter la ĝehoristoj, sed ne estis ŝiaflanke la *Cariad'o*.<sup>\*</sup> La sekvantan Dimanĉon ŝi rimarkis samon, kaj revidis la knabinon palan, solan, kaj melankolian. Ŝi informiĝis pri la kaŭzo de tio ĉi, kaj sciigis, ke kelkaj terfosistoj (unu el kiuj deziris edziniĝi Nest) atakis inside la junan friziston, lin bategis kaj piedfrapis ĝis kiam li ne povis sin movi. Ili minacis lin kaj diris, ke se li iam kuraĝus reveni en

tiun vilaĝon, ili kaŝus lian korpon tie, kie ĝi nur troviĝus je la Fina Juĝo.

*Nia Fraŭlino* multe indignis, ke tia insulto al la tuta vilaĝo ne estis jam punita de ĝiaj viroj. Ŝi ŝin klarigis ke tiuj terfosistoj estis: "Tre grandaj viroj, atletoj. Kaj nombras preskaŭ sesdek, kaj la tuta paroĥo nur enhavas kvardek virojn. Sed ili foriros tuj kiam la nova strato estos finigita, kaj neniu povas devigi Nest edziniĝi. Ĉu ŝi ne povos nenii al ŝi la plezuron vidi la *Cariad'on* ĝis kiam liaj malamikoj foriros?"

*Nia Fraŭlino* aŭskultis, sed ne aprobis; tute ne!

Dimanĉo denove alvenis, kaj ŝi, dum la preteriro al la granda arbo, vidis multajn vilaĝanojn kiuj tie atendis siajn patrinojn, fratinojn aŭ amantinojn; ĉar la viroj tiam nur malofte eniris la preĝejon, krom pro edzigoj kaj enterigiroj. Ŝi ankaŭ vidis grandegan terfosiston klinanta kontraŭ stango apud laĝeto, kaj ŝi laŭte diris, ke ŝi hontus je ŝia lando, se li ne havus plenan trempadon.

La Dimanĉon sekvantan la sama vidaĵo frapis ŝiajn okulojn. Tuje ŝi alproksimiĝis al la homoj sub la arbo kaj diris al ili kiel estas malkuraĝeco permesi, ke fremdulo tiamaniere insultu ilin. "Kial," ŝi diris, "vi ne lin ĵetos en la laĝeton?" Ŝiaj paroloj produktis nenian videblan efekton, ŝi do furioziĝis kaj ekkriis: "Nun, ĉu ne troviĝas inter vi eĉ unu viro? Bone! per Dio, ĝin faros mi mem!"

Per rapidaj longaj paŝoj ŝi marŝis al la terfosisto, lin ekkaptis je la gorĝo kaj forĵetis lin en la akvon.

Neniam li tie revidiĝis. Ŝi raportis ke liaj kunlaborantoj tiel lin mokis, tial ke li estis ĵetita de virino, en akvon ke li lasis ilian bandon, kaj rapide flugis el la lando.

Post mallonga tempo, Nest edzigis sian dandan, malgrandan urbanan *Cariad'on*. La juna paro ĉiam dankis la karan Fraŭlinon pro sia feliĉeco, kiun ili ŝuldis al ŝia decida konduto; kaj la Fraŭlino estis eĉ pli respektigata kaj amata de ŝiaj najbaroj.

La morto de nia Fraŭlino similis je ŝia vivo.

Kiam ŝi kredis, ke la fino alproksimiĝis, ŝi venigis la vilaĝan ĉarpentiston, kaj donis al li la mendojn por ŝia ĉerko kaj ĉiujn la ordonojn por nemultekosta enterigiro.

Post kelkaj semajnoj ŝi unu mateno sentis, ke ŝia animo baldaŭ foriros. Al la karaj parencoj kaj amikoj, kiuj staris ĉirkaŭ la lito, ŝi donis belegajn donacetojn kaj amindajn adiaŭparolojn. Ŝi estis tiel trankvila, kaj ŝia voĉo estis tiel gaja, ke neniu ploris. Kiam ŝi diris: Mi estas laca; ŝi fermis la okulojn, kaj neniam ilin malfermis.

Multaj ploris sian Fraŭlinon.

<sup>\*</sup> *Tiu ĉi vorto signifas "reciproka amo," ne nur inter viro kaj virino, sed ankaŭ inter patro kaj filo, aŭ amikoj. Ĝi do ŝajnas nehavi perfektan tradukon Esperantan.—E.W.*

## UNU NOKTO EN „CALABRE.”

Eltirajo el Paul Louis Courier. Tradukita de Paul Boulet.

Ian tagon, mi vojaĝis en “Calabre.”

Estas lando de malbonaj homoj kiuj, mi kredas, amas neniun kaj malamas precipe la Francojn. Klarigi al vi tion, estus tro longa; sufiĉas diri ke ili malamegas nin, kaj ke oni pasas tre malagrabla la tempon kiam oni estas ĉe ili.

Kiel kunvojaĝanto, mi havis junulon.

En tiuj montoj, la vojoj estas valegoj; niaj ĉevaloj marŝis multepene; mia kamarado rajdis antaŭ mi; vojeto kiu ŝajnis al li pli irebla kaj malpli longa perdigis nin.

Ĝis la eknokto ni serĉis nian vojon tra tiuj arbaroj; sed, ju pli ni serĉis, des pli ni perdigis, kaj la nokto estis densa kiam ni alvenis apud tre nigra domo. . . . Ni eniris ĝin, ne sen suspekto, sed kiel fari?

Tie, ni trovis la tutan familion de karbisto, sidante ĉirkaŭ tablo kie, ĉe la unua vorto, oni invitis nin.

Nia junulo ne petigis sin. Jen, ni estas manĝanta kaj trinkanta, almenaŭ li, ĉar mi, mi ekzamenis la lokon kaj la mienon de niaj mastroj.

Tiuj ĉi havis certe mienon de karbistoj, sed la domo . . . , vi estus kredinta ke ĝi estas armejo. Tie estis nur paŝloj, pistoloj, glavoj, tranĉiloj, tranĉilegoj. Ĉio malplaĉis al mi kaj mi facile vidis ke mi ankaŭ malplaĉis.

Kontraŭe, mia kamarado ŝajnis kvazaŭ li estis ano de la familio: li ridis, li parolis kun ili. Pro malsingardemeco, kiun mi devus esti antaŭpensinta, li unue diris de kie ni elvenis, kien ni iris, kiuj ni estis! Francoj, pensu iom do! Ĉe niaj plej mortigeblaj amikoj, solaj, perditaj, tiel malproksime de ĉiu homa helpo! Plie, por montri ĉion kio povis perdi nin, li ŝajnigis riĉa, promesis al tiuj homoj pro la elspezo kaj por niaj morgaŭtaj gvidistoj, tion kion ili dezirus. Fine, li parolis pri sia valizo, petante ke oni zorgu ĝin multe, ke oni metu ĝin apud lia lito. Li ne volis, li diris, alian kapkusenon. Oni povis kredi, ke ni portis la kronajn diamantojn!

La vespermanĝo finita, oni lasis nin. Niaj mastroj kuŝis sur la suba etaĝo, ni, en la ĉambro kie ni estis manĝintaj. Malalta grenejo, kien oni supreniris per skabelego, estis la dormejo kiu nin atendis, kvazaŭ nesto en kiu oni enirus, rampante sub traboj ŝarĝitaj de provisajoj por la tuta jaro.

Mia kamarado suprenrampis tien kaj kuŝiĝis, dormante la kapo sur la multekosta valizo. Mi, determinata je maldormi, mi plibruligis la fajron kaj sidigis apud ĝi.

La nokto estis preskaŭ finita tute trankvile, kaj mi komencis rekuraĝigi kiam, je la horo kiu kredigis al mi, ke la tago baldaŭ aperos, mi aŭdis, sube de mi, nian mastron kaj lian edzinon paroli kaj interdisputi; kaj, aŭskultante per la kameno kiu komunikis kun la suba kameno, mi perfekte komprenis tiujn ĉi vortojn diritaj de la edzo: “Nu, fine, ni vidu! Ĉu mi devos mortigi ilin ambaŭ?”

Mi restis, apenaŭ spirante, mia tuta korpo, malvarma kvazaŭ marmoro; vidante min, oni ne povis kredi ĉu mi estis viva aŭ ne.

Dio mia! kiam mi pensas ankoraŭ je tio! Ni ambaŭ preskaŭ senarmiloj, kontraŭ ili kiuj havis multe da ili, kaj mia kamarado mortata de dormado kaj de laceco! Alvoki lin? fari bruon? Mi ne kuraĝis; foriri sole, mi ne povis; la fenestro estis nealta, sed, sube, du dikaj hundoj bojegis kvazaŭ lupoj.

Post unu kvarono da horo, kiu ŝajnis al mi tro longa, mi aŭdis sur la ŝtuparo iun kaj per la fendoj de la pordo, mi ekvidis la patron, lampo en unu mano, en la alia unu el liaj grandaj tranĉilegoj.

Li unue supreniris, poste la edzino, kaj mi staris malantaŭ la pordo; li malfermis ĝin; sed, antaŭ ol eniri, li demetis la lampon kaj la edzino ĝin prenis. Poste, li eniris nudpiede, kaj ŝi, estante ekstere, diris al li mallaŭte, kaŝante per siaj fingroj la lumon de la lampo: “Malrapide, iru malrapide!”

Kiam li estis apud la skabelego, li supreniris, sia tranĉilego inter siaj dentoj, kaj, alvenante ĉe la lito kie tiu malfeliĉa junulo etendigis, prezentante sian gorgon malkovritan, li prenis la tranĉilon per unu mano, kaj per la alia . . . li ekkaptis ŝinkon kiu pendis je la plafono, tranĉis unu pecon kaj eliris sammaniere, ke li estis enirinta. La pordo fermigis, la lampo eliris, kaj mi restis sola.

Tuj kiam la tago aperis, la tuta familio, grandabrue, venis vekigi nin, kiel ni rekomendis tion.

Oni alportis la manĝaĵojn; oni servis matenmanĝon, tre puran, tre bonan: mi certigas tion al vi. Du kaponoj partoprenis. “Vi devas, oni diris la kunporti unu el ili kaj manĝi la alian.” Vidante ilin, mi fine komprenis la sencon de tiuj teruraj vortoj: “Ĉu mi devas mortigi ilin ambaŭ?”

Mi kredas ke estas facile diveni kion tio signifis!

## CORRESPONDENCE NOTES.

The suggestion in No. 8 has already borne good fruit, and a weekly meeting has been arranged every Monday at 6 p.m. at *The Club Café*, 5, *Bishopsgate Street Within, E.C.*

During tea conversation in Esperanto is compulsory, but after the meal is over discussions on various topics take place in English. All members of the London Esperanto Club and their friends are cordially invited to put in an appearance when possible, and any foreign friends will of course be especially welcome.

Another meeting has also been arranged for the first Thursday in every month. This is exclusively for annual subscribers to *THE ESPERANTIST*. The Editor will be at the before-mentioned Café from 6—7 p.m., after which hour the Remington Type-writer firm hard by has kindly placed a room at his disposal. Will readers please come every first Thursday, with their proposals for the improvement of this Gazette ?

As has been announced elsewhere, a short three-day visit to Havre, at the invitation of the Group there, is being arranged by the London Esperanto Club for all members who can join. Will these kindly send their names to C. W. T. Reeve, Esq., 63, Effingham Road, Lee, Kent ? There should be as little delay as possible, so that arrangements may be made with the L. & S.W. Railway Co. as to special facilities, etc. It is expected that, encouraged by the most cordial reception accorded by our Boulogne friends at Whitsuntide, a large number of members will make use of this opportunity for improving their conversational powers with foreign friends.

The use of *Sia* and *Lia* puzzled one of our Correspondents. "Is it essential or only optional to use *Sia* when it refers to the subject of the sentence ?" he asks. *Sia* *must* be used in such a case instead of *Lia*, unless, as happens once in a lifetime, ambiguity might arise from such a course, in which case *lia*, *ŝia*, etc., must be used instead.

The fact that double letters only exist in Esperanto when two roots, the one ending and the other beginning with the same letter, are compounded (such as *hommano*) is frequently overlooked, and orthographical mistakes result. This rule is not mentioned in the Text-Books at present in use, and hence, no doubt, the frequency of such mistakes.

*R.'s Epitome* has proved a help to several students, and the author has kindly sent another rhyme, which, we hope, may have a similar result.

EG, when ending any word, shows a *high degree*.  
Final ET, to *birdo* (bird), means a *little B*.

EDZ is *married*, GE means *both*. BO prefixed, *in law*.

ESTR *master*; member AN; IST a *professor*.  
EK *just starts*; and AD *goes on*; RE *repeats*; again ILO *tool*, and EJO *where*; INGO *holder*; then

ERO, *one of*; ARO *lot*; females all have IN;  
UJ *contains*; ID *the young*; ULO *greatest seen*.

IG *becoming*; causing IG; DIS *just separates*;  
ECO, *abstract*; AJO, *work*; MAL *always negates*.

EBLA *possibility*; INDA *worthiness*.

EMA shows *propensity*; adjectives I guess.

(H. W. R., Ipswich).

The order in which the suffixes should be added is logically arranged. Take, for example, the word *Infan-in-eto*. *Infanetino* is not correct, because the *-et* is added to give the diminutive. *Infanino*, a little girl, *Infanineto*, a tiny little girl.

Similarly, in other cases, when two affixes are used in one word it is easy to decide which has precedence.

Who was the first Englishman to learn Esperanto ? We invite correspondence on this interesting point. At the moment it seems that the distinction belongs to H. L'Estrange Ewen, Esq., whose number is 3010, and who, a short time since, wrote us a letter using the old style of writing, *i.e.*, accents inverted, as in Bohemian, *e.g.*, *č*, not *ĉ*.

Pronunciation still presents occasional difficulties to our country readers. The last query to hand deals with the sound of *aj*. This must be pronounced *ahzh*.

To those Correspondents who have asked: Which is the best way to learn to speak Esperanto, we recommend them to talk at first to the door, or any other inanimate object at hand.

Thus *Reading aloud* (or, better still, *Declaiming*) is one of the best exercises, and is a very great help to the rapid mastery of the spoken language. When you have waded through the *Fundamenta Krestomatio* in this manner, and have spent a few days with *Samideanoj* who do not understand English, you should speak Esperanto like a native !

No. 10.

THE

August, 1904.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

EDITED BY H. BOLINGBROKE MURIE.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

PUBLISHED BY THE LONDON ESPERANTO CLUB, 21, DUNCAN SQUARE, LONDON, W.C.

## CONTENTS.

|  | Page    |
|--|---------|
| LA MAURILLADE (translated by Ben Elmy) . . . . .                     | 145     |
| THE MERCHANT AND THE ROBBER (J. W., France) . . . . .                | 146-148 |
| THE MYSTERIOUS WEDDING (translated by Elise Bauer) . . . . .         | 148-150 |
| A FIRST LESSON IN ESPERANTO (Compiled by Rev. R. A. DAVIS) . . . . . | 151-4   |
| DECA PENTAGONA . . . . .   | 155     |
| THREE ADVENTURES OF RAGNAR, THE PIKER (Alfred T. Kemper) . . . . .   | 156     |
| AN UNCONVENTIONAL LOVE-SONG TO A WIFE (Clarence McKnight) . . . . .  | 157     |
| TO A WISE GIRL (Edward Metcalfe M.A., Devon) . . . . .               | 157     |
| LO, THERE I AM! (Cham Song, translated by C. W. T. Heave) . . . . .  | 157     |
| ITEMS OF INTEREST . . . . .  | 158     |
| THE SIMPLE BUNDED ONE (E. W.) . . . . .                              | 159     |
| OPPORTUNITIES PAGE . . . . .   | 160     |

For Local Information apply to the Hon. Secs. of the following Official Societies:

- BATTERSEA—Sec. A. T. LEE, 7, Upper Westbourne Villa, Brompton.
- BRIGHTON—Miss (Mrs.) J. G. WOOD, 10, Upper Westbourne Villa, Brompton.
- BRIGHTON—Sec. H. W. KAY, 22, Kaimosi Road, BRIGHTON.
- COVENTRY ON-TYNE—Sec. LAWRENCE, 100, St. James' Street, Coventry.
- DOVER—Sec. H. R. GIBSON, 1, St. Andrew's Street, Dover.
- EMBDURGH—Miss TORRIS, M.A., 4, Queen's Street, Edinburgh.
- FOREST GATE—Sec. E. J. H. DICK, 74, Marlborough Road, Forest Gate.
- GLASGOW—Sec. J. H. WALLACE, 3, Douglas Terrace, Mount Vernon.
- HULL—Sec. G. H. TAYLOR, 11, Wray Hall Road, Hull.
- LEFORD—Sec. W. A. JEFFERY, 41, York Road, Leford, E.
- REDHILL—Sec. J. HEAR, 1, Cannon Buildings, Dan Street, Redhill.
- LEIPS—Sec. J. E. WYSE, 1, Bedford Square, Leeds.
- LIVERPOOL—Sec. H. E. HARRIS, 1, Cannon Street, Liverpool.
- NEWCASTLE—Sec. U. W. FLETCHER, 10, Central Terrace, Newcastle.
- NOTTINGHAM—Sec. F. O. GORE, 1, Portland Street, Nottingham.
- PORTSMOUTH—Dr. GREENWOOD, 10, Queen's Road, Portsmouth.
- PLYMOUTH—Sec. TARA, 1, Elmwood Terrace, Plymouth.
- ST. ANDREWS—Sec. J. I. ELPHIN, 178, North Street, St. Andrews.
- TYNMOUTH—Sec. ALAN F. DARRINGTON, 10, East Church, Tynemouth.

A.B. It is earnestly hoped that publishers who are willing to have their names and communications with the Hon. Secs., Esperanto Club, will send them to our printer to appear in this or the next issue.

## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

*Unbiased by view of nationality;  
The common bond of union of all civilized peoples.*

The Remington can be supplied fitted for  
any climate.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY.

189, GREGGENTURCH ST., LONDON, E.C.

## La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMASINO.

*Prigenu je tio!*

LA INTERNACIA MASINO.

*Tio liberigita de ĉiuj lingvoj -  
La komuna masino por ĉiuj civilizitaj popoloj.*

La Remingtono povas esti adaptita por  
ĉiuj klimatoj.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY.

189, GREGGENTURCH ST., LONDON, E.C.

NOTICE IS HEREBY GIVEN, that on September 1st the Price of all Back Numbers of "The Esperantist," from No. 2 to No. 8, will be raised to Sixpence instead of Fourpence a Copy.

This is because the stock is nearly exhausted. The cost of No. 1 is still 2s. 6d., at which price the Editor has still three copies for disposal.

All Communications and Contributions should be sent direct to the Editor, at his Private Address,  
87, KENSINGTON GARDENS SQUARE, LONDON, W.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi.

- SRO. JOHN ANDREWS, Higher Lux Street, Liskeard, Cornwall. Kun Geofildianoj jake an lictre.  
SRO. JOHN BOURN, M.C.E., Oswald House, Carlton, Melbourne, Australia. Korespondadi kun Esperantistoj kiuj tute scias la Anglan (kaj prefere ankaŭ la Francan) lingvon.  
SRO. ROBERT CHAMBERLAIN, 65, West Clyde Street, Hutchesburgh, Scotland. Per iliaj p-k. Ĉiam respondas.  
FRANCIS E. M. DOWNS, 53, Nightingale Road, Harlesden, London, N.W. Interŝanĝas iliaj p-k.  
SRO. S. H. EMSTON, 43, Dane Hill, Margate, Kent. Per diversaj aferoj interŝanĝas fotografitaĵoj (prefere stanoŝlopaĵoj) kun ŝulandanoj.  
SRO. S. MATLAND, 22, Madley Road, Kensington, W. Per laŭgalarce ad korespondado. Li nun fonda Esperantan Fotografan Societon.  
SRO. JOHN MICHAMT, 45, Clifton Road, Sheffield, England. Kun alilandanoj per iliaj p-k. Ĝeneras.  
SRO. A. T. STAPEN, Akisrae Bhai, Surobhai Bhai, P.O. Mangalaj, Assam, 3 India. Kun alilandanoj per iliaj aferoj. Interŝanĝas interesajn kaj koordinacajn fotografitaĵojn.

La Kosto de la Enskribo estas 6d. (70¢ per postigno!).

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
FRANCE.—M. C. Gaubert, 9, rue Charras, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol. Podjaceskaja 24 log 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtsignon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povus sendi la abonpagon per poŝtsignoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

No. 10.

AUGUSTO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

Kiam ni estos en Havro ni kunkantu

## LA MARSEILLAISE.

Por la okazo tradukita de Ben Elmy, je 12. 7. 04.

Alvenu, | ho patrujin | fanoj !  
Nun estas | nia glora | tag' ;  
Jen, kontraŭ | ni de la ti | ranoj !  
Lev | iĝas sangminaca | flag' : (bis)  
Ĉu aŭdas | vi en la kamp | aro  
Kru | elajn bruojn de sol | dat' ?  
Li | portas morton sen kom | pat'  
Al la edz | in' kaj junul | aro.

*Ĥoro :*

Land | anoj, armu | vin !  
Bat | alu en kom | bin' !  
Ni | marŝu, | ke l' mal | pura sang'  
Flu | adu ĝis la | fin' !

Do kion | volas sklava | maso,  
La perfid | uloj kaj la | reĝ' ?  
Por kiu | tiom da fra | kaso,  
La feraj | ĉenoj, fera | leĝ' ? (bis)  
Al vi, ho | Francoj, l' insult | eco  
A | signas tior, ankaŭ | pli  
Me | ditas ke devigu | vi  
Eĉ al an | tikva la sklav | eco !

*Ĥoro :*

Landanoj, armu vin !  
Batalu en kombin' !  
Ni marŝu, ke l' malpura sang'  
Fluadu ĝis la fin' !

Tiranoj, | tremu ; perfid | antaj,  
De l' homo | kaj parti' de | grad' !  
Post provoj | patromortig | antaj,  
Vin | sekvos honto kaj pun | ad' ! (bis)  
Ni ĉiuj | volas vin bat | ali ;  
Se | falos iu per la | mort',  
Franc | ujo kontraŭ lia | sort'  
Al | ian naskos rebat | ali.

*Ĥoro :*

Landanoj, armu vin !  
Batalu en kombin' !  
Ni marŝu, ke l' malpura sang'  
Fluadu ĝis la fin' !

Patruja | Amo, sankta, | pia,  
Konduku | nin, kun venĝa | man' ;  
Ha Liber | eco, kara | nia,  
Klopodu | kontraŭ la ti | ran' ! (bis)  
Alflugu | Venko kun fa | voro  
Al | nia helpo sub stand | ard' ;  
Kaj | estu tie en ri | gard',  
Triumfo | ĝia, nia | gloro !

*Ĥoro :*

Landanoj, armu vin !  
Batalu en kombin' !  
Ni marŝu, ke l' malpura sang'  
Fluadu ĝis la fin' !

[Niaj legantoj memoros, ke Franco verkis por THE ESPERANTIST, No. 1, bonegan tradukon de la Angla nacia himno. Ni do esperas, ke niaj Francaj kunbatalantoj ŝatos tiun ĉi tradukon de sia nacia kanto tiel, kiel ni ŝatas la nian. La tradukinto sendis ĝin al ni nur du tagoj post kiam ni proponis ĝin, al li por ke ĝi estu kunportata kun ni en Havron ! Mil dankojn !—REDAKTORO].

**The 'First Thursday' Meeting for Subscribers has been discontinued for the present.  
Members' Monthly Meetings as usual, at 6 p.m., 5, Bishopsgate St. Within, E.O.**

## LA KOMERCISTO KAJ LA RABISTOJ.

Originale verkita de O.W. 7074 (Francujo).

*Mi estis tute juna kiam oni rakontis al mi tiun historion. Jam multe da tempo pasis de tiu tago, jaroj post jaroj; sed ĝi tiel impresis min, ke mi neniam ĝin forgesis, kaj eĉ ne ĝin forgesos. Ne pre mi ne ĝin rakontos al vi tiel agrable, kiel oni rakontis ĝin al mi, sed mi petas de vi indulgon. Estu do malseveraj por aŭskulti min.*

Estis foje riĉa komercisto kiu ne okupiĝis plu pri la negoco kiu loĝis kastelon kuŝitan meze de granda parko, plena je maljunaj, dikegaj kaj altkreskaj arboj. Ĝi estis tute ĉirkaŭita de altaj muroj. Bela ferpordego estis je la enirejo de la parko, kie komencis larĝa kaj longa aleo, ĉiuflanke ombrigita de la arboj. La komercisto havis edzinon kaj du filinojn, kiujn li amis tre varmege.

“Mi estos devigata lasi vin hodiaŭ por aliri la najbaran urbon,” li diris al sia edzino kaj al siaj filinoj: “Mi estas ricevonta grandan sumon da mono, kiun oni ŝuldas al mi de longe, kaj kiun oni devas liveri al mi hodiaŭ. Mi ne povos reveni frue, sed nenion timu, vi scias ke mi ne havas ian malamikon en la lando; mi do revenos hejmen sendangere.”

“Ho!” ekkriis lia edzino, “ne aliru la urbon, mi antaŭsentas, ke okazos al vi malbonaĵo, mi timas ke oni mortigos vin pro la granda sumo da mono, kiun vi kunportos kun vi.”

“Ĉu mi neniam aliris la urbon? Ĉu mi neniam kunportis multe da mono? Ĉu mi iam revenis hejmen tre malfrue, renkontinte danĝeron?”

“Jes, jes, estas vere, sed tiun ĉi fojon, mi ne scias kial, mi timas, mi timegas. Ne deiru, mi petegas vin.”

La infaninoj diris kiel sia patrino, sed la patro mokis ilin, kaj, posttagmeze, li kisis sian familion, diris al ili: “Ĝis la revido,” kaj rajdante sur bona kaj oheema ĉevalo, li fortrotis.

Longa estis la vojiro, kaj nevarma la vetero. Nenio okazis dum la vojaĝo, kaj la komercisto alvenis en la urbon. Tie li ricevis la monon ŝulditan al li, kaj faris aliajn aferojn. Poste li eniris la gastejon, kie estis lia ĉevalo. Bonapetite li vespermanĝis, kontenta pro la bona sukceso de siaj aferoj; tamen li memoris pri la malgajaj paroloj de sia edzino, kaj li ne povis ne pensi pri ili.

Sed, kiam li finis manĝi, li pagis sian elspezon, seligis sian ĉevalon kaj forrajdis kunportante sian monon en monsaketo, alpendita per rimeno ĉirkaŭ la kolo.

Gaje fortrotis la ĉevalo, kiu blekis pro ĝojo, ĉar oni estis bone zorginta pri ĝi en la hotelo, kaj la bela kaj bonrasa besto bone sciis, ke ĝi aliras sian hejmon.

Malgraŭ la nevarmece, oni sentis ke en la aero

estis iom da fulmatondro, kaj oni vidis je la horizonto kelkajn palajn fulmetojn.

Kiel mi jam diris, la vojiro estis longa, kaj nur post du horoj la komercisto alvenis sian hejmon. Li ne rapidigis sian ĉevalon, sed permesis ĝin marŝi laŭvole; ĉar li sciis ke, kiam ĉevalo realiras al sia ĉevalejo, ĝi ne haltas, tute kontraŭe, ĝi rapidas.

Ili devis trapasi grandan tre densan arbaron, kaj la radioj de la luno ne trairis la branĉojn, sed la ĉevalo, oni diras, nokte vidas.

Tiuj altkreskaj arboj, nigraj kaj malgajaj, ŝajnis en tiu malluma vespero tute funebraj, oni kelkfoje aŭdis la kriojn: Hu Hu! de la paserstrigoj, kiuj en ĉiuj landoj estas opiniataj esti funebra antaŭsigno.

La komercisto, iom maltrankvila, nenion vidante en la profunda mallumo, konfidis al sia bona ĉevalo por sekvi la taŭgan vojon por realiri hejmen. Sed pasis multe da tempo, kaj li ne alvenis al sia domo. La ĉevalo kiu estis erarinta, ne sciis plu kien iri. Li kaj ĝi ne rekonis la lokon, li ekscitis la bonan beston por ĝin antaŭenirigi, sed sensukcese.

Kion fari? Kie mi estas? Estas tute malvarme kaj, se mi estos devigata pasigi tie ĉi la nokton, mi mortos pro malvarmece. aŭ kredeble la lupoj manĝos min. Kaj miaj karaj infanoj, mia amema edzino! Kion ili pensos ne revidante min? Ili kredos, ke oni mortigis min! Kiom mi bedaŭras, ke mi ne obeis iliajn konsilojn.

Tiuj malgajaj pensoj plenigis lian animon, sed, ne perdinte tute kuraĝon, li provis trovi la taŭgan vojon; li do prenis sian ĉevalon per la brido; kaj post kelkaj momentoj, je la ekstremaĵo de ia vojeto, li ekvidis lumon. Li eniris tiun aleeton dirante al si, ke almenaŭ li trovos rifuĝejon por si kaj sia ĉevalo. La malaltaj branĉoj batis lian vizagon kaj malfacile ili ambaŭ antaŭeniris. Fine ili alvenis al maldensejo, kie li vidis la ruinojn de antikva kastelo, kun granda korto kaj altaĝa turo. Mezede la korto estis fajro, kies lumecon li estis ekvidinta.

La vojaĝanto kondukis sian ĉevalon en la teretaĝan cambron de la turo, kaj li alligis ĝin per la brido al hoko fiksita en la muro. Li elprenis unu pistolon, kiu estis en unu el la selsakoj, kaj metis ĝin en sian zonon. Sur la tero estis multe da folioj, sendube tie alportitaj de la vento. La



ĉevalo do havus bonan kuŝejon. Poste li alproksimiĝis al la fajro por varmigi sin. Post iom da tempo, plivarmigite, li intencis kuŝiĝi por ripozi atendante la taglumon. Tamen li estis maltrankvila: kiu ekbruligis tiun fajron? Kia estas tiu antikva kastelo kiun mi ne konas kaj pri kiu mi neniam aŭdis? Tiuj, kiuj ekbruligis la fajron sendube revenos. . . . Kaj ĉiam la penso pri la antaŭsentoj de lia edzino revenis en lian memoron.

Sed li estis tre laca kaj li falis pro laceco; li pretiĝis por envolvi sin en sian mantelon, kaj etendiĝi teren apud la fajrejo . . . kiam subite li aŭdis bruadon de paŝoj kaj de kantoj. La voĉoj ŝajnis ebriaj, kaj li tre timis.

Kiaj estas tiaj homoj kiuj venas je tiu horo en tiun dezertan lokon? Nepre ili estas rabistoj kiuj ne sole rabos min sed ankaŭ min mortigos. Tiaj estis la pensoj de nia timegata heroo. Li tuj starigis, forkuris al la turo ne atendante la novvenantojn, kaj, kaŝinte sin malantaŭ kolono en la teretaĝa ĉambro de la turo, li vidis per la lumo de la fajro grandan amason da viroj, kiuj eniras la korton. Li tuj vidis, ke ili estas rabistoj. Ili ja havis ĉiuspecajn armilojn, kaj sovaĝajn kaj kruelajn vizaĝojn. Ili freneze kantas kaj ŝajnas ĝojegaj.

"Nu! Kunuloj," diris la Kapitano, altkreska viro kun la vizaĝo nigrharplena, kun tigras okuloj. "Nu! ni noktmanĝu kaj trinkadu! Poste ni dividos la kaptajn. Vi ĉiuj estos kontentaj hodiaŭ, kaj mi vetus, ke kelkaj el vi aliros por loĝiĝi en la urbon, kaj tie travivos kiel honestuloj de ĉiuj respektataj, kaj honoritaj, iom pli malfrue, per altaj rangoj kaj ordenoj!"

Samtempe li ridegis, kaj ĉiuj imitis lin.

"Ja, ni efektivigis hodiaŭ belegan, mirindan aferon. Mi bone sciis, ke riĉa komercisto estus forestinta de sia kastelo kaj mi faris uzon el la okazo por vin alkonduki en ĝin, kie ni ĉiom kaptis. La kastelmastrino kaj ŝiaj filinoj estas forkurintaj, kaj ni, por nin varmigi, ekbruligis la kastelon. Certe, en tiu ĉi momento, ĝi estas nur amasego da cindroj. La akiraĵo estas grandega, kaj kiel mi jam diris, ni estas ĉiuj riĉaj, ĉur vere, li estis tre riĉa, tiu komercisto. Ĉi do, kunulo, iru en la kelon, kaj alportu la manĝaĵojn kaj precipe multe da vino; ni devas festi nian mirindan sukceson!"

La juna kunulo obeis la ordonojn de sia Kapitano kaj, post kelkaj minutoj, ĉio estis preta. Ili manĝis kaj drinkadis kiel porkoj: la vino malaperis en iliajn gorgojn kiel en funelojn.

Sed subite starigis la Kapitano, kaj teruravoĉe li ekkriis: "Je la diablo! iu alvenis tien ĉi dum nia forestado. Mi volas tion scii, tuj, je ĉiuj diabloj de la infero! Ĉu vi ne vidas, teruro kaj sango! ke oni enmetis lignon en la fajron, alie ĝi

estus tute estingita, kaj nun, mil demonoj! ĝi estas tiel brila, kiel ĝi estis kiam ni foriris! Mi tion ripetas al vi, mil tondroj! iu tien ĉi venis kaj, se li surprizis niajn sekretojn, sango de Diablo! li devos morti senkompatate."

"Jes, jes!" ekkriis la aliaj unuvoĉe, "ni mortigos lin! Ni mortigos lin!" kaj laŭ ĉiuj direktoj ili deiris.

La Kapitano eniris la teretaĝan ĉambron de la turo, kune kun kelkaj el siaj kunuloj, kaj, rigardinte en angulo, li ekvidis la ĉevalon.

"Ĝi ne alligis propramove, tiu ĉi ĉevalo!" ekkriis li: "kaj tiu, kiu ĝin alligis, ne estas malproksime de tie ĉi. Nepre ni lin kaptos, kaj ne estos por li kompatate."

La malfeliĉa komercisto, kiu unue kaŝigis malantaŭ unu el la kolonoj, kiuj subtenas la arkojn, aŭdinte tiujn parolojn, alkuris al la ŝraŭbforma ŝtuparo, kiu estis en angulo de la ĉambro, kaj rapide supreniris la ŝtupojn. Kiam li estis proksime je la unua etaĝo, li haltis por aŭskulti la interparoladon de la rabistoj. "Li ne estas tie ĉi, sed kredeble li estas en la turo. Ni do supreniru!" diris tiuj ĉi.

Tion aŭdinte, la timegata komercisto surrampis al la dua etaĝo. Ĉien traserĉis la rabistoj, kaj la malfeliĉulo surrampis la etaĝojn, unu post la alia, ne trovante ian lokon por sin kaŝi.

Fine li alvenis sur la supraĵon: denta muro ĝin ĉirkaŭis.

Tie ĉi, do, mi estos devigata morti, li pensis, kaj adresis lastan penson al sia kompatinda edzino, al siaj malfeliĉaj infanoj, kaj li pretiĝis por ĵeti sin super la muro en la profundegaĵon, ne volante ke la rabistoj lin mortigu.

Li aŭdis la paŝojn de la serĉantoj, kiuj rapidas al la lasta etaĝo, kaj, instinkte rigardante la malplenaĵon antaŭ ol morti, li ekvidis ferbaron, fiksitan en la muro, kiun, en la antaŭaj tempoj, oni uzis por starigi la standardon de la kastelmastrino; tute kovrita de rustaĵo estis tiu baro.

Jen, li pensis, estas mia lasta rimedo por provi min savi, la rabistoj ne rigardos eksteren kaj, kiam ili estos foririntaj, mi resupreniros la supraĵon.

Li do pasis super la muron, kaptis la ferbaron per la manoj, kaj tie apogis sin super la profundegaĵo. Li aŭdis la kriegojn de la rabistoj, kiuj, furiozaj nenion trovinte, blasfemis kiel demonoj, kaj malsupreniris la ŝtuparon.

La komercisto, iom trankviligita, ne aŭdinte plu ian brueton, decidis por realiri la supraĵon kaj, levante la okulojn por vidi la randon de la denta muro, li pretiĝis por ĝin kapti per la mano . . . sed, kiel mi povos esprimi la teruron, kiu premis lian animon, kiam li vidis du okulojn, brilajn kiel fajra karbo, kiuj rigardis lin kruuele. Tiam mokanta voĉo diris al li: "Nu!

kara komercisto, vi estas tre agrable lokata tie; tamen mi pli ŝatas mian lokon ol la via, sed nenion timu, mi ne volas mortigi vin."

Tion aŭdinte nia heroo rekuraĝigis, kaj li penis por atingi la muron per la mano, sed la rabisto diris al li: "Ne! ni ne volas mortigi vin, sed vi mortigos vin mem; kaj mi devas sciigi al vi ke, se vi penos por ekkapti la randon de la muro, mi tuj mortigos vin." Samtempe li direktis al lia vizago pistolon

La pendanto, kiu sentis, ke liaj fortoj foriĝas, faris lastan penon por ekkapti la muron, sed la daciĝo ne tion ebligis, kaj la skuo estis tiel forta, ke la ferbaro kurbigis; pli kaj pli, pro la maleŝperitaj penoj, kurbigis la ferbaro. Ĝi fine preskaŭ kontaktiĝas kun la muro.

La malfeliĉulo vidis, ke ne estas plu unu sola ŝanco por savi sin. Mil teruraj pensoj premegis lian animon. Pense li adresis lastan adiaĵon al sia familio. Tiam, per la maldekstra mano li fortege premegis la ferbaron kaj, per la dekstra, li prenis la pistolon kiun li estis enmetinta en sian zonon. Pro la mallumo la Kapitano ne ekvidis tiun geston. Direktinte ĝin al la vizago de la rabisto, li diris:

"Mi devas morti, sed ci ankaŭ mortos." Kaj li pafis; sed tiu lasta peno, tute senfortiginte lin, li duone svenis, lasis la ferbaron, kaj falis en la profundegajon . . . !

Sed, karaj Gelegantoj, nenion timu! nek por la honesta komercisto nek por la abomena Kapitano de la rabistoj.

La komercisto, lacega pri sia longa rajdado, estis ekdorminta sur sia ĉevalo, kiu kviete estis kondukinta lin ĝis lia hejmo. La subita halto ĉe la fera pordego de la parko vekigis lin, kaj li preskaŭ falis de ĝia dorso.

Aŭdinte la ĉevalon, la pordisto malfermis la pordegon, kaj, ĝoje blekante, la ĉevalo, kiu ne estis dorminta dum la vojaĝo, aliris al la domo.

Mi povas certigi al vi, ke la koro de la rajdanto perforte batadis, kiam li trairis la longan kaj malhelan aleon de sia parko, kaj li ne povos kredi, ke lia edzino kaj liaj infanoj estas ankoraŭ vivaj en la luksa kastelo.

Liaj karesoj estis tute necesaj, por ke li kredu, ke lia malagrablega sonĝo ne estis vera.

Tamen li ĵuris, ke de nun, li ne plu iros al la urbo por reveni nokte sur ĉevalo.

## LA MISTERA EDZIĜO.

Dana Rakonto de Henry Steffens, tradukita de Elise Bauer.

Nordokcidente de la insulo Zelando etendas sin malvasta duon-insula distrikto fruktodona, supersemita de vilaĝetoj, kaj kunigita kun la ĉeftero per mallarĝa sablaĵo. Super la sola urbo, kiun tiu ĉi duoninsulo posedas, la tero perdiĝas en la senkvietaj ondoj de la Kategato kaj prezentas terure sovaĝan kaj senfruktan vidaĵon. La mova sablo tie ĉi malaperigis ĉiun postsignon de kreskaĵoj, kaj la ventegoj kiuj blovegas el ĉiuj flankoj de la maltrankvila oceano ĉiam kaŭzaads ŝanĝon sur la supraĵo de la dezerto, kies sablaj montetoj alterne formiĝas kaj malaperas, senkvietaj kiel la ondoj, kiuj muĝadas ĉirkaŭe.

En tiu ĉi dezerta lando estis vilaĝo nomita Roerwig, ĉirkaŭ unu mejlo de la marbordo.

La mova sablo estas enteriginta la vilaĝon, kaj la loĝantoj, plimulte paŝtistoj aŭ fiŝkaptistoj, estas forlasintaj siajn dometojn proksimajn je la bordo. Unu sola konstruaĵo, la vilaĝa preĝejo, kiu staras sur monteto, ankoraŭ levas sian kapon super la nuda, ŝanĝema dezerto. Tiu ĉi preĝejo estis la scenejo de la sekvanta okazintaĵo.

Je la komenco de la lasta centjaro, la respektinda pŭrohestro de Roerwig sidis en sia studejo en pia meditado. Estis jam noktomezo. La domo staris

sur la rando de la vilaĝo, kaj la moroj de la loĝantoj estis tiel malmulte miksitaj kun malvido, ke rigiloj kaj seruroj estis nekonataj inter ili. Ĉiu pordo restis malfermita kaj negardita.

La noktlampo brulis malhele, la premanta silento de la malluma horo estis nur interrompata de la mallarĝa bruo de la maro, en kies ondoj la pala luno rebrilis. Subite la pastro aŭdis la pordon de la domo malfermiĝi kaj virajn paŝojn sur la ŝtuparo. Li atendis vokon al mortanto por alporti al li la lastan Sanktan Sakramenton kiam du fremduloj, envolvitaj en blankaj manteloj, rapide eniris en la ĉambron. Unu el ili alproksimiĝis, kaj ĝentile diris: "Sinjoro, vi havos la bonecon tuj sekvi nin. Vi devas fari edziĝan ceremonion; la geedzoj atendas vian alvenon en la preĝejo. Tiu ĉi sumo" daŭrigis la nekonatulo, vidiganta al la maljunulo monujon plenan je oro "sufiĉe rekompencos vin por via peno, kaj la maltrankviliĝo, kaŭzita de nia subita postulo."

La pastro rigardadis kun muta timo la fremdulojn, kiuj havis ion strangan, preskaŭ teruran en siaj mienoj. La postulo ripetigis kun tono serioza kaj komanda. Retrovinte sin de sia surprizo, la pastro komencis dolĉe komprenigi, ke

lia devo ne permesas al li fari tian solenan agon, ne konante la geedzigontaj. Sed nun la alia fremdulo antaŭenpaŝis kun minaca mieno, kaj diris: "Sinjoro, vi havas vian elekton: sekvu nin kaj prenu la prezentitan sumon, aŭ rifuzu kaj tiu ĉi kuglo pasos tra via kapo."

Samtempe li levis sian pistolon al la frunto de la respektindulo kaj atendis lian respondon.

Tiu ĉi levigis, sin vestis, kaj sciigis al siaj vizitantoj, kiuj ĝis nun estis parolantoj Dane, sed kun alilanda akcento, ke li estas preta por sekvi ilin.

La misteraj alilanduloj nun silente marŝis tra la vilaĝo, sekvataj de la pastro.

Estis malluma aŭtuna nokto, la luno jam mal-supreniris; sed, forlasinte la vilaĝon, la maljunulo ekvidis kun teruro kaj miro, ke la malproksima preĝejo estas lumigita. Liaj akompanantoj, envolvitaj en siaj blankaj manteloj, rapide marŝis antaŭ li tra la nuda sabla ebenaĵo.

Alveninte ĉe la preĝejo, ili kovris liajn okulojn, flanko pordo malfermiĝis kun bone konata brueto, kaj la pastro sentis sin puŝatan en amason da personoj. Tute ĉirkaŭe li aŭdis murmuron de voĉoj kaj, proksime al li, paroladon en lingvo nekonata al li, sed li pensis ke ĝi estas Rusa. Starante senhelpa, okulkovrita, premata de ĉiuj flankoj, kaj tre konfuza, li sin sentis kaptatan de vira mano kaj violente tiratan tra la amason. Fine ŝajnis al li kvazaŭ la homoj malantaŭeniris; oni forprenis la bandaĵon de liaj okuloj, kaj li sin trovis starantan, kun unu el la fremduloj, antaŭ la altaro.

Vico da grandaj brulantaj kandeloj en belegaj argentaj kandelinoj ornamis la altaron. La preĝejo mem estis belege iluminita per sennombraj kandeloj. Se antaŭe dume liaj okuloj estis kovritaj, la murmurado de la ĉirkaŭa amaso estis pleniginta lian animon je konsterno, li nun ne malpli mirigis je la neinterrompita silento, kiu reĝis en la preĝejo. La flankoj kaj benkoj estis superplenigitaj, sed la meza trairejo estis tute malplena, kaj en ĝi li ekvidis nove malfermitan tombon. La ŝtono, kiu estis kovrinta ĝin, estis apogita kontraŭ benko ĉirkaŭ li, li vidis nur virajn estaĵojn sed sur unu el la malproksimaj benkoj li kredis distingi virinan formon. La silento daŭrigis malmultajn minutojn, dum kiuj neniam movo estis vidata inter la kolektigaro.

Fine viro, kies belega vestaĵo distingigis lin de la aliaj, kaj anoncis lian altan rangon, levigis kaj rapide trapaŝis la malplenan trairejon. Liaj paŝoj resonadis tra la konstruaĵo kaj ĉiuj okuloj sin turnis sur lin. Li estis de meza kresko, kun larĝaj ŝultroj kaj fortaj membroj. Lia irado estis komanda, lia vizaĝ-koloro flavabruna, liaj haroj korb-nigraj, liaj trajtoj severaj, kaj liaj lipoj

kunpremitaj kvazaŭ en kolero. Granda agla nazo plifortigis la arogantecon de lia mieno, kaj densaj mallumaj brovoj malaltigis super liaj fervoregaj, brulaj okuloj. Li portis verdan veston kun larĝaj oraj galonoj kaj brilanta stelo. La fianĉino, kiu nun staris genue apud li, estis riĉege vestita. Ĉielblua vesto, argente ornamita, envolvis ŝiajn delikatajn membrojn kaj falis en larĝaj faldoj sur ŝian gracian figuron; diademo brileganta je diamantoj ornamis ŝiajn malhelajn harojn. Ŝiaj trajtoj estis belegaj, kvankam malespero nun montriĝis en ili; ŝiaj vangoj estis palaj kiel tiuj de malvivulo, ŝiaj okuloj malsekaj je ploroj kaj ŝiaj senpovaj brakoj pendis senmove apud ŝia preskaŭ senviva korpo.

Genue antaŭ la altaro la figuro de morto, ŝajnis ke teruro estis rigidiginta ne sole ŝiajn vivemajn povojn sed ankaŭ ŝian konscion.

La pastro nun ekvidis proksime al li maljunan malbelulinon, en multekolora vesto, kun sang-ruga turbano sur ŝia kapo, kiu rigardadis la genufleksantan fianĉinon kun esprimo de Furio. Li ankaŭ ekvidis malantaŭ la fianĉo viron de grandega kresko kaj malluma vido, kies okuloj estis senmove fiksitaj tere, Terurigite la pastro staris muta dum kelke da tempo ĝis elvokanta rigardo de la fianĉo memorigis al li la ceremonion, kiun li devis fari.

Sed la necerteco ĉu la geedzigontoj komprenas lian lingvon estis por li nova fonto de maltrankvileco. Tamen li kuragiis demandi la nomojn de la gefianĉoj. "Neandro kaj Feodora" estis la respondo farita en malĝentila voĉo.

La pastro nun komencis legi la preĝojn kun tremanta voĉo. Ofte li eraris kaj haltis por ripeti la vortojn, sed nek la fianĉo nek la fianĉino ŝajnis rimarki lian konfuzon, kaj tio ĉi plicertigis al li ke ili ne komprenas lian lingvon. Adresinte la demandon: "Neandro ĉu vi volas havi tiun ĉi virinon por via edzino," li dubis ĉu li ricevus ian respondon, sed je lia miro, la fianĉo respondis jese, kun laŭta, preskaŭ kria voĉo, kiu resonadis tra la preĝejo, dume profundaj ĝemoj de la tuta aŭditorio akompanis la teruran "Jes!" kaj tremeto, kiel la rebrilo de malproksima fulmo pasis super la vizaĝo de Feodora. Tiam la pastro turnis sin al ŝi kaj diris pli laŭte por veki ŝin el ŝia svenadego: "Feodora, ĉu vi volas havi tiun ĉi viron por via edzo?" La senviva formo antaŭ li ŝajnis revivigi ĉe tiu ĉi demando, ŝiaj lipoj tremadis, ekbrilo de fajro radiis en ŝiaj okuloj, ŝia brusto levigis kaj mallevigis, ploroj mallumigis la brilon de ŝiaj okuloj, kaj la "Jes" elvenis kiel krio de dolorego de mortanto, kaj ŝajnis trovi eĥon en la sonoj de ĉagrenejo, kiuj ekvenis de la ĉirkaŭa amaso. La edzino falis en la brakojn de la abomeninda maljunulino.

Kelkaj minutoj pasigis en terura silento, la pala

preskaŭ senviva virino denove genufleksis kvazaŭ en profunda svenado, kaj la ceremonio estis finita. Nun la edzo levigis kaj kondukis sian edzinon al ŝia antaŭa sidejo, sekvata de la grandegulo kaj la malbelulino. Tiam la du fremduloj reaperis kaj, kovrinte la okulojn de la pastro, puŝis lin perforte ekster la pordon, kiun ili riglilis interne. Dum kelkaj minutoj li penis kolekti sin, kaj estis necerta ĉu la terura sceno kun siaj rimarkindaj cirkonstancoj ne estis sonĝo. Sed, forŝirinte de siaj okuloj la bandaĵon, li vidis antaŭ li la lumigitan preĝejon, li aŭdis la murmuron de la amaso kaj li estis devigata kredi je ĝia realeco.

Por vidi la finiĝon, li sin kaŝis en angulo de la konstruaĵo kaj, aŭskultante li aŭdis la voĉojn plilaŭtigi, fervora malpaco fariĝis, li kredis rekoni la voĉon de la edzo, komandantan silenton.

Sekvis longa paŭzo.

Subite, pafo eksonis. Krio de virina voĉo aŭdiĝis.

Denove paŭzo, poste sonadis la battoj de laboriloj, kiuj daŭrigis preskaŭ kvaronon da horo.

Tiam la kandeloj estingiĝis, la murmuro rekomencis, la pordo malferniĝis kaj aro da personoj ekkuris el la preĝejo kaj rapidis al la maro.

La maljuna pastro eliris el sia kaŝejo kaj rapidis returnen en la vilaĝon, kie li vekis la najbarojn kaj amikojn, por rakonti al ili sian nekredoblan kaj mirindan aventuron. Sed ĉio, kio ĝis nun estis okazinta inter tiuj ĉi simplaj homoj, estis estinta tiel kvieta kaj ordinara, ke alia teruro atakis ilin. Ili kredis, ke ia malfeliĉa akcidento estis detruinta la spiriton de ilia amata estro. Tiu ĉi havis grandan malfacilecon venigi kelkajn el ili al la preĝejo, armitajn de hakiloj kaj fosiloj.

Mateniĝis, kaj kiam la bona pastro kune kun siaj kunuloj supreniris la monteton, ili ekvidis militan ŝipegon apud la marbordo, kun veloj streĉitaj, forveturantan al la nordo.

*Pakaĵo por Avo!*—Nun, do! ekkriis knabineto, dum ŝi serĉis tirkeston:

“Avo ja iris en ĉielon sen liaj okulvitroj! Kion li faros?”

Iom poste, kiam oni supozis, ke alia parenco en la domo estis morte malsana, ŝi kuris al lia litflanko kun la avaj okulvitroj en ŝia mano, kaj diris:

“Vi estas mortonta?”

“Oni diris al mi tion.”

“Ironta al ĉielo?”

“Mi ĝin ja esperas!”

“Nu, jen la okulvitroj de avo, volu preni ilin al li!”

(J.T.).

*La Vilaĝanino kaj ŝia Laktokruĉo.*—Vilaĝanino ortante sur ŝia kapo kruĉon da lakto, piediris

Je tia mirinda vidaĵo en tiu ĉi malproksima regiono la vilaĝanoj jam ŝanceliĝis forĵeti rakonton de la pastro kiel neverŝajna, kaj ili inkliniĝis ankoraŭ pli kredi ĝin, vidante ke la pordo de la preĝejo estis malfermita perforte. Plenaj je atendoj ili eniris kaj la pastro montris al ili la tombon malfermita en la nokto. Estis facile vidi, ke la ŝtono estis levita kaj remetita. Ili faris uzon de siaj iloj, kaj baldaŭ nova, riĉe ornamita ĉerko aperis. La maljunulo malsupreniris en la tombon kun malpacienca de junulo. Aliaj lin sekvis, kaj ili kune forlevis la kovrilon. Tiam la pastro trovis siajn antaŭsentojn certigitajn. En la ĉerko kuŝis la mortigita edzino, kuglo estis penetrinta ŝian bruston ĝis la koro. La belega diademo, kiun ŝi estis portinta, estis malaperinta, sed la freneza esprimo de ĉagreno estis forlasinta ŝian vizaĝon kaj ĉiela trankvileco kuŝis sur ŝiaj trajtoj.

La maljunulo sin ĵetis ĝenuen apud la ĉerko, kaj ploregis kaj preĝis laŭtavoĉe por la animo de la mortigitino, dume liaj akompanantoj staradis mutaj kaj terurigitaj.

Li sin kredis devigata sciigi la okazintaĵon al sia estro la Episkopo de Zelando, kaj, ĝis la alveno de ia ordono, li jurigis ĉiujn siajn amikojn gardi la sekreton. Baldaŭ persono de altega rango alvenis el la ĉefurbo, demandis pri ĉiuj cirkonstancoj, vizitis la tombon, laŭdis la observitan silenton kaj diris, ke la tuta okazo devas por ĉiam restadi sekreto.

Samtempe li minacis per severa puno ĉiun, kiu kuraĝus paroli pri ĝi.

Post la morto de la paroĥestro, oni trovis en la paroĥa registro-libro skribon, rakontantan tiun ĉi aferon. Kelkaj kredas, ke ĝi havas ian sekretan kunigon kun la violentaj politikaj ŝanĝoj, kiuj havis lokon en Rusujo post la morto de Katerino kaj Petro I., sed estas malfacile, se ne neeble, solvi la profundan enigmon de tiu mistera edziĝo.

vigle, kaj samtempe pripensadis: “La mono, kiun mi ricevos por tiu ĉi lakto ebligos min pligrandiĝi mian kvanton da ovoĵ ĝis mi havos tri centojn. La ovoĵ produktoj almenaŭ ducent kvindek kokidojn. Tiuj kokidoj estos taŭgaj por vendejo ĵus kiam la kortbirdaro estos ĉiam kosta; tiel ke mi nepre havos sufiĉe da mono por aĉeti novan robon. Vestita je tiu robo, mi iros al la foiro, kien ĉiuj junuloj penados por min akompani; sed, ne! mi rifuzos ĉiun ol ili per kaptanceligo.” Kontentega je tia ideo, la fraŭlino ne povis deteni sin, kaj, nekonscie, movis sian kapon, laŭ la penso, kiu ŝin posedis, kiam subite falis la kruĉo da lakto, kaj ŝia tuta fantazia feliĉo tuj malaperis.

“Ne kalkulu viajn kokidojn antaŭ ol ili elseliros.”

## A FIRST LESSON IN ESPERANTO. UNŬ. Ā LĒCION. Ō PRI ESPĒRANT. Ō.

Compiled by Rev. R. A. Davis.



A (ah as in half)—A, adjective ; AS, present tense ; ANTA, pres. part. act. ; ATA, pres. part. pass.

E (ei as in eight)—E, adverb.

I (ee as in three)—I, infinitive ; IS, past tense ; INTA, past part. act. ; ITA, past part. pass.

O (o as in No.)—O, noun ; OS, future tense ; ONTA, fut. part. act. ; OTA, fut. part. pass.

U (wo as in two)—U, imperative ; US, conditional.

AJ, i in five ; AŬ, ou in out ; OJ, oy in boy ; C=ts ; Ĉ=ch (*church*) ; G=g in go ; Ĝ, g in *George* ; J, y in *yes*=plural ; Ĵ, s in *pleasure* ; N, accusative or direct object, motion towards, direction, time, dates, duration, price, weight, measure ; Ŝ, sh in *cash* ; KN.KV, "I think no one should drink vinegar."

All vowels are rather long. The tonic accent marked ' is in the last syllable but one.

I think someone is knocking—ringing.

Mi pens. as ke oni frap. as—sonor. as.

Go and see who is there. Who is knocking ?

Ir. u kaj vid. u kiu est. as tie. Kiu frap. as ?

Who is there ? It is Mr. A.

Kiu est. as tie ? Ĝi est. as Sinjor. o A.

Come in.

En. ir. u.

Good day, Sir.

Bon. a. n tag. o. n, S<sup>ro</sup> (Sinjor. o).

How do you do ?

Kiel vi san. as ?

Very well, Sir, thank you.

Tre bon. e, Sinjor. o, mi dank. as vi. n.

Please close—lock—the door.

Vol. u ferm. i—ŝlos. i—la pord. o. n.

Take a seat, please. Do you know me ?

Sid. iĝ. u, mi pet. as. Ĉu vi mi. n kon. as ?

I have not the honour of knowing you.

Mi ne hav. as la honor. o. n vi. n kon. i.

I am a stranger to you, but I am a friend of Mr. B.

Mi est. as ne. kon. ata al vi, sed mi est. as amik. o de Sinjor. o Bo.

I have something to say to you.

Mi hav. as io. n por dir. i al vi.

What do you want ? What do you wish ?

Kio. n vi bezon. as ? Kion vi vol. as ?

I want to speak to you.

Mi bezon. as parol. i kun vi.

Can I be of any use to you ?

Ĉu mi pov. as est. i util. a al vi ?

Forgive me, but I have received a letter which I cannot understand.

Pardon. u al mi, sed mi ricev. is leter. o. n kiun mi ne pov. as kompren. i.

Can you understand it ?

Ĉu vi pov. as kompren. i ĝin ?

Show me the letter, perhaps I can (shall be able to) help you.

Montr. u al mi la leter. o. n, ebl. e mi pov. os help. i vi. n.

It is a letter from one of my friends, but he has written it in some strange language.

Ĝi est. as leter. o de unu el mi. a. j amik. o. j, sed li ĝin skrib. is en ia strang. a lingv. o.

Yes, he has written to you in Esperanto.

Jes, li skrib. is al vi en Esperant. o.

Esperanto ! What is that ? I have never heard of it.

Esperant. o ! Kio est. as tio ? Mi nen. iam aŭd. is pri tio.

It is the new international language.

Ĝi est. as la nov. a internaci. a lingv. o.

But who speaks Esperanto ?

Sed kiu parol. as Esperant. o. n ?

People-of-every-land, and they find the propagation of Esperanto exceedingly (.eg.) pleasurable.

Ĉiu. land. an. o. j, kaj ili trov. as plezur. eg. a la propagand. o de Esperant. o.

Esperanto is the international language. By means of this language one can be understood by the whole world. You ought to learn it.

Thank you. Now, kindly tell me what my friend wishes to say in his letter.

\* \* \* \*

Now, let us continue our conversation about Esperanto—the most useful language.

Is an international language possible?

Yes, and Esperanto is a very interesting language. You can make use of it whenever you need to write to persons living in foreign lands who possibly do not know your language, and whose native language you do not know.

Wonderful! But how is it possible to do that? Suppose that the person addressed not only does not know the language, but, like me, has not even heard of it?

You have only to send with your letter a small leaflet called "Little Vocabulary," and the person addressed will be able to understand your letter.

Is it possible?

I assure you it is so.

Well, what is truly your opinion about it? What do you say about it?

I certainly think that it is a practical language for international correspondence, and that it is the only practical solution to enable everyone whatsoever to correspond with people living in other countries. I am convinced that it will be (come) a great gain (boon) for the world if it receives the attention which it deserves.

Bravo! I think that that is a magnificent idea. But I fear that few Englishmen will use it.

Well, I have received a foreign publication, and it contained a leaflet. What do you think it was? It was "A Directory of Tradespeople accepting the use of Esperanto"! If the foreign tradespeople are accepting the use of Esperanto, English tradespeople must accept it too.

Well, I, at least, will begin to learn. I believe that perhaps the use of Esperanto will help me in my business. How can I begin to learn Esperanto?

I have some books for learning, and I will lend them you.\*

I thank you, but, pardon me, could you teach me?

Yes, certainly, with pleasure.

You are very kind. When will you come?

What is the date to-day? I will come in a few days—next Saturday.

Esperant.o est.as la internaci.a lingv.o. Per tiu.ĉi lingv.o oni pov.as est.i kompren.at.a de la tut.a mond.o. Vi dev.as ĝi.n lern.i.

Mi dank.as vi.n. Nun, vol.u rakont.i al mi tio.n, kio.n mi.a amik.o vol.as dir.i en si.a leter.o.

\* \* \* \*

Nun, ni daŭrig.u ni.a.n inter.parol.ad.o.n pri Esperant.o—la util.eg.a lingv.o.

Ĉu internaci.a lingv.o est.as ebl.a?

Jes, kaj Esperant.o est.as tre interes.a lingv.o. Vi pov.as util.ig.i ĝi.n kiam ajn vi bezon.as skrib.i al person.o.j loĝ.ant.a.j en fremd.a.j land.o.j, kiu.j ebl.e ne sci.as vi.a.n lingv.o.n, kaj kies naci.a.n lingv.o.n vi ne sci.as.

Mirind.e! Sed kiel est.as ebl.e ti.o.n far.i? Supoz.u ke la adres.it.o ne nur ne sci.as la lingv.o.n, sed, kiel mi, eĉ ne aŭd.is pri ĝi?

Vi dev.as nur send.i kun.e kun.vi.a leter.o mal.grand.a.n foli.et.o.n nom.at.a.n "Vort.ar.et.o," kaj la adres.it.o pov.os kompren.i vi.a.n leter.on.

Ĉu ĝi est.as ebl.a?

Mi vi.n cert.ig.as, ke est.as tiel.

Nu, kio est.as ver.e vi.a opini.o pri ĝi? Kio.n vi dir.as pri ĝi?

Mi cert.e opini.as, ke ĝi est.as praktik.a lingv.o por inter.naci.a korespond.ad.o, kaj ke ĝi est.as la sol.a praktik.a solv.o por ebl.ig.i ĉiu.n ajn korespond.i kun ali.land.ul.oj. Mi est.as konvink.it.a ke ĝi (far.ig.os) est.os grand.a gajn.o por la mond.o se ĝi ricev.os la atent.o.n, kiu.n ĝi merit.as.

Brave! Mi pensas, ke ĝi estas bonega ideo. Sed mi timas, ke malmultaj Angloj uzos ĝin.

Nu! mi ricevis fremdan eldonaĵon, kaj ĝi enhavis folieton. Kion vi pensas ke ĝi estis? Ĝi estis:—"Adresaro de la Komercistoj akceptantaj la uzadon de Esperanto." Se la fremdaj komercistoj akceptas la uzadon de Esperanto la Anglaj komercistoj devos akcepti ĝin ankaŭ.

Nu, mi, almenaŭ, komencos lerni. Mi kredas, ke eble la uzado ĉe Esperanto helpos min en mia komerco. Kiel mi povos komenci lerni Esperanton?

Mi havas lernolibrojn kaj mi prunte donos ilin al vi.

Mi dankas vin, sed, pardonu min, ĉu vi povus instrui min?

Jes, certe, kun plezuro.

Vi estas tre ĝentila. Kiam vi alvenos?

Kian daton ni havas hodiaŭ? Mi venos post malmultaj tagoj, la Sabaton plej proksiman.

I will visit you any time that is agreeable to you.  
 Come as often as possible—every day if you like.  
 I will do that willingly.  
 I think I will come to you to-morrow, and from now I will visit you daily.  
 At what hour will you come to my house ?  
 I will come at 10.25.  
 We can begin to-day. I can give you the first lesson now ; do you consent to that ?  
 Yes, certainly, with pleasure. I consent heartily.  
 Here are the books. Have you a grammar ?  
 Yes, here it is ; but I cannot find the dictionary.  
 I cannot find it anywhere in the room.  
 Have you put it anywhere ?  
 I cannot remember.  
 Where are your other books ?  
 They lie on the table in the dining-room.  
 I have neither pencil nor pen.  
 If you have a pen or pencil, kindly lend it me.

Have you a better pen than this, for I cannot write with it ?  
 Where are your pencils or pens ?  
 They are in that box by the inkstand.  
 There are not many pens in the pen box.  
 I want a penholder. Are you writing ?  
 I cannot understand your writing.  
 †Always write legibly !  
 How do you pronounce this word ?  
 What is the meaning of this word ?  
 Do you understand this lesson ?  
 Yes, I understand it well.  
 Can you not understand me ?  
 Yes, Sir, I understand you.  
 Why don't you answer ? Why are you silent ?  
 I cannot do my exercise correctly. I cannot do my exercises, for I have no dictionary.

I will see about the dictionary, and perhaps I will send it to you to-morrow.  
 What would do if you were I ? What do you advise me to do ?  
 I advise you to learn these easy exercises in this book by heart.  
 You will soon be able without trouble to read and speak Esperanto. You must remember these rules.  
 I shall never forget them.  
 When you believe your acquisition of Esperanto is sufficient to begin corresponding, you can have your name entered amongst the Esperantists whose names appear in the Adresaro.  
 Do you want anything ?  
 I want the books which you have lent me.

Mi vizitos vin tiam kiam estos agrable al vi.  
 Venu kiel eble plej ofte, ĉiutage, se vi volos.  
 Tre volonte mi faros tion.  
 Mi pensas ke mi venos morgaŭ, kaj de nun mi vizitos vin ĉiutage.  
 Je kioma horo vi venos al mia domo ?  
 Mi venos je la dek-dudek-kvin.  
 Ni povas komenci hodiaŭ. Mi povas doni al vi la unuan lecionon nun ; ĉu vi konsentas al tio ?  
 Jes, certe, kun plezuro ; tutkore mi konsentas.  
 Jen estas la libroj. Ĉu vi havas gramatikon ?  
 Jes, jen ĝi estas ; sed mi ne povas trovi la vortaron.  
 Mi ne povas trovi ĝin ie en la ĉambro.  
 Ĉu vi metis ĝin ien ?  
 Mi ne povas memori.  
 Kie estas viaj aliaj libroj ?  
 Ili kuŝas sur la tablo en la manĝoĉambro.  
 Mi havas nek krajonon nek plumon.  
 Se vi havas plumon aŭ krajonon, volu aminde prunte doni ĝin al mi.  
 Ĉu vi havas pli bonan plumon ol tiu ĉi, ĉar mi ne povas skribi per ĝi ?  
 Kie estas viaj kraĵoj aŭ plumoj ?  
 Ili estas en tiu skatolo apud la inkujo.  
 Ne estas multaj (multe da) plumoj en la plumujo.  
 Mi bezonas plumingon. Ĉu vi skribas ?  
 Mi ne povas kompreni vian skribaĵon.  
 Ĉiam skribu legeble !  
 Kiel vi elparolas tiun ĉi vorton ?  
 Kio estas la signifo de tiu ĉi vorto ?  
 Ĉu vi komprenas tiun ĉi lecionon ?  
 Jes, mi komprenas ĝin bone.  
 Ĉu vi ne povas kompreni min ?  
 Jes, Sro, mi komprenas vin.  
 Kial vi ne respondas ? Kial vi silentas ?  
 Mi ne povas korekte fari mian ekzercon. Mi ne povas fari miajn ekzercojn, ĉar mi ne havas vortaron.  
 Mi zorgos pri la vortaro, kaj eble mi sendos ĝin al vi morgaŭ.  
 Kion vi farus se vi estus mi ? Kion vi konsilas al mi fari ?  
 Mi konsilas vin lerni parkere tiujn ĉi facilajn ekzercojn en tiu ĉi lernolibro.  
 Vi baldaŭ povos senpene legi kaj paroli Esperanton.  
 Vi devas memori tiujn ĉi regulojn.

Mi neniam forgesos ilin.  
 Kiam vi kredos, ke via akiro de Esperanto estas sufiĉa por komenci korespondadon, vi povos enskribigi vian nomon inter la Esperantistoj, kies nomoj aperas en la Adresaro.  
 Ĉu vi bezonas ion ?  
 Mi bezonas la librojn kiujn vi prunte donis al mi.

\* Complete Text Book, 1/8 ; Thirty-Six Exercises and Keys, 1/3 ; THE ESPERANTIST, Monthly, 3/- per annum (all post free), from the Librarian, Esperanto Club, 41, Outer Temple, W.C.

† Editor's Request.

Here are the books.

I will read each one carefully before I return it to you. I shall read that book to-morrow morning. I shall read for two hours every day. If I read this book at the rate of two pages an hour, I shall finish it in three weeks or a month.

Whose book is this ?

This book belongs to my wife.

I have found the dictionary.

Where was it ?

I found it in my box.

I shall buy these books. I shall read every Esperanto book that I get. The more I hear of Esperanto the more I like it.

\*Always employ Esperanto when you write to me. Your idea is very good. I will write as often as possible, as soon as possible ; in a few days.

I heartily thank you. I do not know how to thank you for your great kindness.

I am very glad that I have been able to be of use to you. I think you will progress very well—at least, I will help you in every way.

Thank you once more.

Au revoir.

Good-bye.

Jen estas la libroj.

Mi legos ĉiun zorge antaŭ ol mi redonos ĝin al vi. Mi legos tiun libron morgaŭ. Mi legos du horojn ĉintage. Se mi legos po du paĝoj en ĉiu horo, mi finos ĝin en tri semajnoj aŭ unu monato.

Kies libro tiu ĉi estas ?

Tiu ĉi libro apartenas al mia edzino.

Mi trovis la vortaron.

Kie ĝi estis ?

Mi trovis ĝin en mia skatolo.

Mi aĉetos tiujn ĉi librojn. Mi legos ĉiun Esperantan libron kiun mi ricevos. Ju pli mi aŭdas pri Esperanto, des pli mi ŝatas ĝin.

Ĉiam uzu Esperanton, kiam vi skribos al mi.

Via ideo estas tre bona. Mi skribos al vi kiel eble plej ofte . . . kiel eble plej frue . . . post malmultaj tagoj.

Mi dankas vin korege. Mi ne scias kiel danki vin pro via granda afableco.

Mi estas tre kontenta ke mi povis esti utila al vi. Mi kredas ke vi progresos tre bone, almenaŭ mi helpos vin ĉiel.

Mi dankas vin ankoraŭ unu fojon.

Ĝis la Revido !

Adiaŭ !

In addition to the rules mentioned at the beginning of this Lesson, the Grammar of Esperanto is further simplified by the following devices.

The Definite article is invariably LA ; the Indefinite article does not exist.

About thirty affixes are employed to modify the meanings of root-words, thus minimising the amount of brain work required to acquire a long vocabulary.

Prefixes.—MAL—indicates all Opposites. Amiko, friend. Malamiko, enemy. Varma, warm. Malvarma, cool.

RE—indicates the repetition of an action. Fari, to do. Refari, to do again.

FOR—denotes motion away from. Rajdi, to ride. Forrajdi, to ride away.

Suffixes.—AR indicates collection of. Arbo, tree. Arbaro, forest.

—AN . . . inhabitant of. Angla, English. Anglano, Englishman.

—IN is the Feminine suffix. Viro, man. Virino, woman. Patro, father. Patrino, mother.

—IST . . . Occupation. Boto, boot. Botisto, bootmaker. —IL . . . instrument. Kudri, to sew. Kudrilo, needle.

—EG augmentative. Pordego, a big door. —ET diminutive. Pordeto, a little door.

Students will do well to remember that Double letters only occur when two roots, the one ending and the other beginning, with the same letter, are joined. Hom-mano, a human hand. Re-en-iri, to go in again.

ESTI, to be, is the only Auxiliary verb. I have seen, Mi estas vidinta. He has been seen, Li estas vidita. All shades of meaning can be expressed in Esperanto.

Questions are introduced by the word Ĉu, and the order is not inverted. Ĉu mi vidas, Do I see.

Prepositions govern the Nominative case, unless motion towards be indicated, when Accusative termination is used. Promeni en la ĝardeno(n). To walk in(to) the garden.

THERE ARE NO EXCEPTIONS TO ANY OF THE RULES IN ESPERANTO.



## OUR PROGRESS; OR, SIGNS OF THE TIMES.

The Head Teacher of one of the London County Council Schools has been taking his elder boys through a *con amore* course of Esperanto. This course is much appreciated. Happy boys of this New Age to be able to learn the Most Modern of Languages by means of exercises taken from the fascinating tales in this Gazette, instead of from such old-style phrases as: "The remembrance of your assiduity has rewarded me"; or, "The libraries of this town are very small."

Mentioning *Libraries* reminds us that the copy of *The Complete Text-Book*, supplied to a London Free Library by one of our enthusiastic supporters, has already been so much in demand, and has consequently become worn out, that another copy has been applied for.

Esperanto has now been adopted by the Yöst School of Shorthand and Typewriting in Liverpool.

In illustration of the commercial utility of Esperanto, our readers will be interested to learn that a Huddersfield hardware firm has sent a secretary to London to acquire the language, owing to the large number of communications received from abroad in this idiom.

We have received a letter from John Harrison, Esq., 114, Plymouth Place, Leamington. He is desirous of starting an Esperantists' Society in that town. He adds: "It is wonderful what a brotherly feeling exists among Esperantists. I regularly hear from 'Via fidela Bohema amiko'; from a Spaniard who 'Sincere premas vian manon'; from a Russian who 'Sendas saluton al malproksima Anglujo.' A Dutchman kindly translated one of his national songs into Esperanto for me, and a Buda Pesth friend sent me an illustrated paper containing an Esperanto page. From other countries I have had most friendly and interesting communications."

Esperantists having friends in Leamington should make Mr. Harrison's wish known.

A valuable article on Esperanto has appeared in the *Warrington Observer*. The author, H. Powell Hughes, Esq., of 3, Fairfield Road, Stockton Heath, will gladly send a copy on receipt of postage. We hope that many more Esperantists will use this means of propaganda. Another article, perpetrated by the present writer, has recently appeared in the *St. James' Review*.

The spirited correspondence which has occupied considerable space in the last four numbers of the *Cyclist Touring Club Gazette* continues with increased "ferocity" in the July number. A long letter in Esperanto itself appears there, and we Britishers are much indebted to M. Bourlet for his able contribution. The nescient opponents who have taken up the hostile pen probably belong to the ranks of those who, some time ago, equally opposed the introduction of an important cycling innovation. But their literary dust will no more hinder the ultimate triumph of Esperanto than it did the rapid progress of the Free-wheel among cyclist enthusiasts.

A prominent New York journal has prevailed on Dr. Zamenhof to contribute an article on his life's work. We have translated this most able treatise into English for Dr. Zamenhof, and expect it will arouse considerable interest in the States, when published.

J. F. H. Woodward, Esq., writes to say that he is re-opening his Esperanto Class at 4, St. Swithin's Road, Bournemouth, on the second Thursday in August, at 8 p.m., and will be glad to hear from any who desire to join. He will also with pleasure give information to Esperantists visiting Bournemouth who will call on him.

On Saturday, June 25th, a lecture was given in German about Esperanto to the German Communist Club, Charlotte Street, W. The chair was taken by Herr Professor Buss. About two hundred persons were present, and listened for about an hour and a-half with great attention. A Class has now been arranged, presided over by Esperantist 7778.

The publication of the penny *Text-Book*, referred to in No. 9, has, unfortunately, been postponed for a few weeks, owing to delay in obtaining the accents.

Apology is due to all who have been impatiently awaiting the arrival of the *Adresaro* for 1904. Although published in May, the bulk of the copies are still in the hands of the Russian Censors, who are, no doubt, most interested in the names of Esperanto's many new adherents! We trust, however, that their task will soon be satisfactorily accomplished, so that our daily influx of peppery post cards may cease. [*Adresaro* now to hand].

KELKAJ AVENTUROJ DE BAGH,<sup>1</sup> LA TIGRO.

Vera Rakonteto de Teogardeno en Asamo.—Originale verkita de Alfred T. Simper.

Ni jam sciigis pri lia proksimeco jela ĝardeno, sed, dum multaj monatoj, liaj solaj faradoj estis la mortigado kaj mangado de unu aŭ du ĝardenaj Kulioj<sup>2</sup>.

De unu kompatinda viro nenio estis postlasita krom la kranio, kiu kuŝis mezvoje.

Sed la vilaĝanoj de tiu ĉi parto malfeliĉe tiel kutimigis je tia okazo, ke oni neniel dezertis la vojon. Kaj la kvar Angloj sur nia Ĝardeno kontente vivadis kaj trankvile. Ili estis certegaj, ke la bestoj de Hindujo, kiel ankaŭ la popolo, timiĝus preni la sangon de siaj mastroj, la blankaj homoj.

Nu, venis sezono kiam la cervoj malmultiĝis, kaj maljuna Bagh, kun granda penado apenaŭ trovadis sufiĉan mangaĵon por konservi sian vivon. Diris li: "Nunatempe estas malbone! Tage la vilaĝanoj promenadas multanombre, kaj dum la mallumo ne aperas. Ofte ili enmetas fajron en la longa herbo, kio tre timigas min." Kaj, je la penso, li ruligis siajn okulojn, nudigis siajn dentojn kaj ekĝemis. "Iafoje, tuta semajno pasas, kaj mi ne vidas eĉ cervon, kvankam mi certe ne sopiras je tia malestimaĵo. Sed estas blanka viro kiu, ĉiutage, forrajdas, kaj ĉiuvespere revenas, preter la vojo. Li kaj lia ĉevalo fariĝus sufiĉa mangaĵo dum tuta monato. Kiu timiĝas je la blanka viro? Ne mi! mi ankoraŭ trinkos lian sangon!" Kaj Bagh ŝmacis siajn lipojn.

Estas bonekonata fakto ke, post la unua gusto de homa sango, la tigro tre sopiradas je ĝi dum sia vivcetero. De tiam li nomiĝas "virmangulo" kaj fariĝas pli terura ol ia alia besto.

Tagon, je la krepusko, mi tre surprizigis vidi mian kolegon freneze rajdantan en la ĝardenon. Li alvenis senĉapele, senspire, kaj sia vizaĝo aperis kvazaŭ li estis vidinta la Diablon. Efektive granda tigro estis elsaltinta el la junglo.<sup>3</sup> Nature la ĉevaleto pro granda teruro ekforkuris, sed, feliĉe por li, mia amiko povis konservi egalpezon sur la selo. Alie, ni ankoraŭ estus senavizaj—kaj tiel ankaŭ estus la malfeliĉulo!

La sovaĝbesto do ĉasadis lin, sed la ĉevalisto fortege jetis sian kaskon poste en la vizaĝon de la besto. Tio videble, faris la deziritan efekton, ĉar li ne plu sekvadis. Sed la flugulo neniam haltis antaŭ ol li alvenis ĉe siaj kolegoj. Niaparte, kvankam ĝi kompreneble estis okazo tro vera, ni ekopiniis la aferon kiel granda ŝerco, kiel bona ridindaĵo. Sed le nervoj de mia amiko estis kvazaŭ detruataj, kaj eĉ nun ili estas iom malfortaj.

Proksimatage oni eliris por serĉi la kaskon, sed ĝi ne estis trovebla.

"Kaj kion opiniis Bagh?" vi demandas.

Tiu sinjoro estis kuŝinta en la fina stato de senpova frenezo. Pecetoj de la kasko ĉirkaŭis lin.

Lia longa vosto batis la subaĵon. Eĉ la lacertetoj timigis montri sin, sed ili aŭdis liajn vortojn kaj laŭte tremadis.

"La blankaj viroj ja estas la mastroj de ĉio," diris Bagh, penante senkulpigi sin. "Se tiu ĉi estis estinta Hindu, mi certigas, ke mi estus kaptinta lin, ĉar la Hinduoj rajdas sur malrapidaj ĉevaletoj. Sed kiu povas ĝiskuri la ĉevalon de la blankulo?"

"Malbenu la blankan homaron!" li blekdiris. "Kial ili venas en tiu ĉi lando? Mi scias, ke ili ne apartenas al ĝi, ĉar, anstataŭ ol kunloĝi li familie en vilaĝoj, ĉiu loĝas sole en aparta domo, kun multe da Hinduoj por atenti lin. Denove, ili alvenas kaj foriras simile al la jar sezonoj, kaj ĝis nun mi ne vidis iajn inojn aŭ idojn. Sed de kie ili venas, kaj kien ili iras neniu scias! Ne, ili estas senrajtuloj! Krom ili, kiuj estus mastroj de tiu ĉi lando? Tre certe, la tigroj!"

Kelkminute Bagh pripensadis pri tia feliĉa estado. Tiam li daŭris: "Sed la malbonuloj trairas la kampon sur elefantoj, kaj dissemas morton per tondro kaj fulmo. Kion! Ĉu ili estos permesataj, senrefrape, malsanktigi niajn proprajn loĝejojn? Ha! Mi havas ideon! Mi eĉ vizitos la hejmon de blankulo, kaj vengos iliajn insultojn. Feliĉe la tuta lando ankoraŭ estas nia proprejo ĉiu nokto, kiam ni povas iradi, maltime, kien ajn ni deziras."

Tiel okazis ke, la proksima noktomezo, mi miregis trovi min tute veka—tre neordinara okazo je mi.

Subite mi sciigis pri laŭta nazspirado ekster la maldikaj muroj. La bruo movadis de pordo al fenestro, de fenestro al pordo, tute ĉirkaŭ la domo. Kelkafoje profunda bleketo sonoris—nur klarigo de la gorgo, mi supozas. Nu, estas unu afero moki onian amikon ĉar li forkuris de tigro dum la taglumo. Sed, kredis min, estas tute alia afero esti vekata noktomeze de malsata besto, precipe kiam oni memoras ke, se ĝi sciis, ke puŝado de sia frunto aŭ unu bato de sia piedo kontraŭ la fenestro donus al si la deziritan mangaĵon! Sed la tigro ne atakis la malfortan konstruaĵon kaj mi hodiaŭ povas skribi tiujn ĉi vortojn. Tamen ŝajnis al mi multaj horoj antaŭ ol li foriris.

Post kelkaj tagoj la blankaj viroj venis kun pafiloj kaj elefantoj kaj multe da Hinduaj servantoj. Kia glora vidaĵo estis vidi ok grandegajn olefantojn majeste promenantajn tra la longa herbo.

Sed Bagh sukcese kaŝadis sin kaj ne plu estis vidita. Li jam estis forlasinta la ĉirkaŭaĵon, neniam (espereble) por reveni.

<sup>1</sup> Bagh, la Hindu vorto por Tigro. <sup>2</sup> Hinduaj laboristoj.  
<sup>3</sup> La dika kreskaĵaro.

NESENTIMENTALA AMKANTO AL  
EDZINO; AŬ PROFITEMA AMO.  
Originale verkita de Clarence Bicknell.

Mi amas vin tagiĝe,  
Ĉar vi, senkorenuo,  
Min lasas redormantan  
Dum vi levigas frue.  
La domon vi balaas,  
La fajron vi bruligas,  
Kaj por la matenmanĝo  
La kafon vi pretigas.

Mi amas vin matene,  
Vi iras al vendejo  
Aĉeti necesajojn  
Por mi kaj kuirejo;  
Kaj poste vian devon  
Mastrinan bone faras,  
Ĉar mian tagmezmanĝon  
Por zorgo vi preparas.

Mi amas posttagmeze,  
Ĉar, apud la stebilo  
Vi sidas kun kotono  
Kun pingloj kaj kudrilo.  
Vi fikas la tolaĵon  
La jakojn, la kalsonojn,  
Vi gladas la ĉemizojn  
Aŭ metas la butonojn.

Kaj post la taglaboro  
Mi amas vin vespere  
Ĉar tiam, laca, sata,  
Mi *ĉiujn* amas vere.  
Kaj en seĝeg' sidante  
M legas La Gazeton,  
Aŭ ĝuas mian pipon  
Kaj, eble, dormeteton.

Sed, pleje, dum la nokto,  
Edzin', mi vin amegas,  
Ĉar (ekceptinte ronkon)  
Trankvile vi dormegas.  
Kaj tiam vi ne povas  
Min plu riproĉegadi,  
Aŭ kun la najbarinoj  
Senĉese babiladi.

Vivu la Gazeto!  
Verda diamanto!  
Vivu Zamenhofo!  
Vivu Esperanto!  
Vivu Esperanto, kara lingvo nia!  
Vivu Zamenhofo, Elpensinto ĝia!  
(4686).

## KARULINETO!

Originale verkita de Edward Metcalfe,  
M.A. (Oxon).

Ruĝaj pafarkoj viaj du lipoj  
Pafas senĉese, ho! belulino,  
Helajn sagetojn,  
Dolĉajn ridetojn,  
Je mia koro, jun' kaptantino.  
Lagoj profundaĵ viaj okuloj:  
Belaj feinoj tie kuŝantaj  
Ĉiam gajemaj  
Ĉiam amemaj,  
Kaptas la pensojn de koroj amantaj.  
Retoj de haroj sunokaptantaj,  
En kies maŝoj nun impleksiĝas  
Grand' radiaro:  
Ho! kiel aro,  
Aro de koroj ankaŭ kaptiĝas.  
Kiel potencaĵ manoj senpovaj,  
Kara kvarjara infanineto,  
Vere infano  
Estas la amo,  
Vivu, grandigu, dolĉ' Karulineto!

## LU MI' KARA LU.

Por la melodio de la fama Amerika "Coon"  
Kanto, de Harry Dacre.  
Tradukita de C. W. T. Reeve.

Lulu ĉu ve venos kune kun ĉe mi,  
Lulu mi' kara Lulilu?  
Mi havas belan kanton, kiun eble vi,  
Kantos en la ĥoro, Lulilu.  
Mi ludos la gitaron se vi kantas kun,  
Ĉar vi' voĉo ŝajnas tiel dolĉa nun.  
Venu sub la luno; Venu nun kun mi.  
Respondu nun al mi. Respondu nun al mi.

*Ĥoro* :—

Mi pensas pri neniu krom vi Lulu.  
Mi' kara Lu, Mi' bela Lu  
Matene post dormante,  
Mi vekigas ploregante,  
La kaŭzo estas Lu,  
La tutsola kaŭzo estas Lu, Lu, Lu.

Kial Lulu koleriĝas nuu je mi,  
Lu, Lu, ĉiame kara Lu?  
Ĉu vi povas trovi bonan pli ol mi?  
Diru nur la veron Lulilu!  
Ofte ĵaluzulo forte batas sin,  
Ĉar la nigrulinoj multe amas min.  
Tamen en la mond' neniu amas mi  
Escepte Lu, Jes—Ŝi—  
Escepte Lu, Jes—Ŝi—  
*Ĥoro* :—Mi pensas, k.t.p.

## DIVERSAJ AVIZOJ.

Ni ricevis Bulgaran tradukon de Esperanta Lernolibro (de M. Cart), verkita de Sro. Atanosof. Ni esperas ke ĝi, kune kun la Unufoliego anoncita en nia lasta numero, multe helpos la disvastigon de la kara lingvo (kosto 5d.).

La Esperanta Germana Vortaro ankaŭ alvenis, kaj oni devas gratuli Sron. Jurgensen pri la bonegco kaj grandeco de lia verko. Ĝi enhavas 220 bonepresitajn paĝojn, kaj kostas 2s. afrankite.

La *Swiss, Aix-les-Bains and Nice Times* de Junio 19 enhavas daŭrigotan artikolon pri Esperanto kiu kredeble interesos ĝian kosmopolitan legantaron. La artikolo estas skribita en la Angla lingvo de Sro. Hector Hodler, Redaktoro de la Juna *Esperantisto*.

Kunbatalanto en Victoria, Aŭstralio, skribas: "Kvankam estas nur antaŭ malmultaj semajnoj, ke mi estas lerninta ke Esperanto estas vivanta, mi memoris, ke oni al mi sendis antaŭ multaj jaroj, gazeton Esperantan Hodiaŭ (Junio 6) mi serĉis inter diversaj paperaroj, presaĵoj, leteroj, k.t.p., kaj trovis jene: *La Esperantisto*, No. 1, Nurnberg, 1 Septembro, 1889.

"Estas tre interese vidi, ke ĝi presigis preskaŭ tute en la nuna Esperanto."

"ESTIMATA SINJORO,—Mi havas la plezuron anonci al vi, ke multaj personoj interesas sin pri nia Liona bonfarado. Jam mi posedas pli ol 630 lotaĵojn, sed nun ni devas disvendi 3,000 biletojn! Kiel vi scias tre certe, la serioj de 5 biletoj havas almenaŭ unu gajnantan numeron. Mi plezurege sciigas al vi, ke la Rhona Prefekto, volante partopreni al nia bonfarado, sendis kune kun afabla letero, belegan bronzan artfaritaĵon; statuon reprezentantan 'La Ventego.'

Kiel mi tre deziris du oficialajn lotaĵojn, mi faras ankoraŭ paŝadojn ĉe la Lionan Urbestron; mi atendas lian respondon, kiu tre certe, estos favora.

Ni devos ankoraŭ sciigi al viaj Gelegantoj, ke antaŭ du tagoj, mi ricevis mendon de 100 biletoj de Ŝia Moŝto la Reĝino de Sved-kaj-Norveĝujo, kiu interesiĝas pri tio, kion oni povas fari por faciligi la vivadon de la malfeliĉaj blinduloj.

Jen kelkaj bonaj novaĵoj, kiuj kuraĝigos la ŝanceligantojn aĉeti biletojn.

Volu akcepti miajn sincerajn salutojn,

E. ZABILON D'HER."

Oni adresu la mendojn de biletoj rekte al Fraŭlino Zabilon d'Her, 33, rue Sala, Lyon, France.

La Berlina Grupo pretigas dum la somero Esperantan Ekspozicion, kiu estos farata en la aŭtuno, kaj kies celo estas malfermi ĝian vintran agadon kaj Esperantajn kursojn. Oni esperas, ke la tutmonda Esperantistaro sendos poŝtkartojn al Prinzenstrasse 95 Berlin S.

Ĉe la Essex Hall kunveno de la Londona Klubo, Julio 11, oni decidis nenion definitivon pri la proponita fondo de Komerca Fermo. Ŝajne la ĝenerala opinio estis, ke tia entrepreno ne helpus je la Klubaj aferoj.

La Hon. Sekretario, Sro. H. Bolingbroke Mudie, bedaŭrinde estis devigita ekŝigi tiun Sekretariecon pro la grandega laboro de la Redaktado kaj eldonado de lia Gazeto.

Li dankis la Membrojn pro la tre kora aprobes-primio pri liaj penadoj, kiun oni donis al li, kaj diris ke li esperas, ke tiuj afablaj Esperantaj amikoj, kiuj korespondadis kun li ĉar li estis la Hon. Sekretario, daŭrigos siajn interesajn leterojn, sendante ilin al lia privata adreso, 67, Kensington Gardens Square, W.

Sinjoro Stead proponis, ke la Klubo estu remodelata, por ke ĝi fariĝu Societo de ĉiuj Britaj Esperantistoj, estrita de delegatoj de ĉiuj la Britaj Grupoj. Oni aplaudis la proponon, kaj eble la nova Hon. Sekretario baldaŭ povos sendi pluajn avizojn pri la rezultato de la propono.

"Triope" estas la nomo de la plej nova Esperanta libreto. Sinjorino Fauvart-Bastoul (Vic-Prezidantino de la Diĵona Grupo) tie donas al ni alian tradukon de "Nokto en Calabre" (THE ESPERANTIST, p. 143).

La dua parto estas Humoraĵaro, tradukita de Sro. Louis Fauvart-Bastoul. Tiam sekvas "Historia aventuro de la Imperia epopeo" originale verkita de Skadrestro Fauvart-Bastoul.

Tre bone presita en la Franca kaj Esperanta lingvoj, tiu ĉi libro estas interesa aldono al nia literaturo, kaj ankaŭ estas tre ŝatinda ekzemplo de Familia-verko.

La Septembra numero kredeble enhavos: Rakonton de H. G. Wells, tradukita (kun la permeso de la aŭtoro) de Dr. Martyn Westcott. Ankaŭ Originala Esperanta Sistemo de Eterna Kalendaro, elpensita de Rev. R. A. Davis; belaj poemoj kaj aliaj interesaĵoj tie troviĝos. Doktoro R. J. Lloyd, D. Litt., M.A., ankaŭ afablege promesis verki artikolon pri la Esperantaj Fonetikoj.

## LA SIMPLANIMULO.

Originale verkita de E.W.

*Por daŭrigi tiujn ĉi skizetojn pri miaj amataj samlandanoj, mi raportos pri la jena okazo, pri kiu mi skribis iom post kiam mi ĝin estis vidinta.*

Mi vidis belegan pejzaĝon kaj la herbo estis tiel malseka, ke mi petis al kamparanino ke ŝi pruntu al mi seĝilon kiam mi skizus. Ŝia edzo alportis maton kaj seĝon, kiujn li metis por mi ekstere de la plektobarilo de la ĝardeneto. Mi sidigis tie kaj skizadis.

Post iom da tempo mi aŭdis piedfrapadon de ĉevalo, kaj poste, la voĉon de la rajdanto.

“Bonan matenon,” li diris al la viro, “ĉu via nomo estas Thomas Johns?”

“Nu, vere, Via Moŝto, oni min konas per tiu nomo en tiu ĉi loko.”

“Ĉu vi estis en la vendejo ĉe Llanfach sabaton?”

“Vere, Via Moŝto, mi ne ofte iras en vendejojn: tie estas ĉiam tro da trinkaĵo kaj da—”

“Ne penu min trompi, Vi tie estis lastan Sabaton kaj vi partoprenis en la tumulto ĉe la vendejo.”

“Vere, Via Moŝto, neniam mi deziras tumultojn, ĉar mi ĉiam estas sobra, bonkonduta, junulo.”

“Tiom pli bone; via atesto estos tiom pli utila. Tial, senprokrasto diru al mi akurate ĉion, kion vi aŭdis kaj vidis dum la tumulto.”

“Ĉu, Via Moŝto, parolas pri batalo? Mi ĝin ne vidis, mi nenion tie vidis, ja nenion!”

“Sed vi certe devas esti vidinta ĉion; la loko estas tre malgranda.”

“Vere, Via Moŝto, se la loko estas tiel malgranda, kiel mia ĝardeneto, mi povis ion nek vidi nek aŭdi, ĉar mi ne estis sabaton ĉe la vendejo.”

“Estas senutile peni min trompi. Mi havas certan informon, ke vi ĉeestis dum la tuta tempo.”

“Vere, Via Moŝto, al mi ne konvenas kontraŭdiri Vian Moŝton, kiu estas tiel scienculo kaj kiu estis edukita ĉe granda Universitato Angla, kaj vi havas grandajn literojn post via nomo.”

“Nu! Diru al mi ĉion, kion vi vidis, kaj memoru, ke vi devos ĝin ripeti en la juĝejo.”

“Vere, eĉ se mi devus ĵuri en la juĝejo de la Ŝafido en la ĉiela Jerusalemo mi ne povus diri, tion, kion mi neniam vidis, ja neniam!”

“Je kia horo vi venis en la vendejon sabaton?”

“Vere, Via Moŝto, kiam mi tie iras, mi alvenas kutime iom antaŭ la deka.”

“Nu, vi estis tie vidita de la deknua matene ĝis la kvar. Vi vidis la tutan aferon!”

“Vere, Via Moŝto, mi ja nenion vidis. Sed, se Via Moŝto bonvolos skribi sur papero tion, kion mi vidis, mia edzino min helpos ĝin lerni, kaj en juĝejo mi ĝin diros je mia ĵuro. Unue mi diros, ke Via Moŝto diris, ke mi ĝin vidis, ĝi do devas esti vera, ĉar Via Moŝto estas tiel klera sinjoro.”

“Mi kredas, mia amiko, ke vi ne estas tiel simplanimulo, kiel vi ŝajnigas. Sed mi vin citos, kaj vi venos, aŭ vi estos punata.”

“Vere, Via Moŝto, mi venos.”

La ĉevalo kaj sia rajdanto foriris. Kiam mia skizo finiĝis, mi levigis, kaj la viro revenis al mi dirante: “Mia Fraŭlino, ĉu vi pensas de mia parolado kun la advokato?”

“Vi ne devas koleriĝi, mi mem estas Galino, kaj mi hontas kiam mi aŭdas miajn samlandanojn verŝajne mensogi. Kial vi ne rekte kaj honeste respondis: Jes, Via Moŝto, mi ĉeestis?” mi respondis.

“Jes, vere jes. Sed ĉu vi neniam legis vian Sanktan Bibliion? Ĉu vi ne legis: Ne ĵetu viajn perlojn al porkoj? Tio signifas: Diru neniam la veron al advokato, ĉar, se vi ĝin faras, li certe ree sin turnos kaj vin disŝiros. Ankaŭ, se mi honeste al li diris, ke mi estis tie, mi estus mensoginta, tial ke mi ne tie estis. Mi laboris la tutan tagon ĉe la landsinjoro F. La viro, kiun la advokato bezonas, estas Thomas John Johns, kiu loĝas duonmejlon de ĉi tie. Se mi estis dirinta tion ĉi al li, mi ne estus aginta je mia najbaro tiel, kiel mi dezirus, ke li faru je mi. Neniu el ni iam ŝatas devi paroli kun juĝoj kaj advokatoj. Nu! Supozante ke kelkaj amikoj kunvenas en la vendejo, kaj la biero superfluas iliajn cerbojn tiel, ke ili malpacigas kaj batalas; certe ili povos decidi siajn proprajn aferojn. Se kelkaj kapoj estos fendataj de bastonoj, tio estas multe pli bone ol esti fendataj de la paroloj de advokatoj en ilia bela Angla miksaĵo kaj konfuzo, kiun ili nomas lingvo! Ke la viroj arangu aŭ batalu ĝis la fino, kaj tiel fariĝu pli bonaj amikoj ol antaŭe. Jen estas mia opinio.”

“Sed kion vi faros kiam vi ricevos vian asignon?” mi demandis.

“Mi iros, ja, mi iros; kaj mia edzino akompanos min. Ŝi povos grimaci ridindege. Ofte, ja ofte, miaj najbaroj kunridos kun ni kiam ŝi imitos la malsagan mienon de la advokato, kiam li aŭdos Sinjoron F. diri, ke mi estis dum la tuta tago dek du mejlojn de la vendejo!”

La kamparano laŭtege ridis, kaj mi ne povis min deteni de kunridi ankaŭ.

Kompreneble mi ripetis la konversacion al neniu, nek tiam nek tie. Lia konfido je mi, nekonatulino, plaĉis al mi. Mi sciis, ke li ŝatis min, ĉar nur unufojon li nomis min “Fraŭlino.”

Montri multe da ceremonia respekto antaŭe estis la ĝentila Gala maniero por esprimi la maleslimon aŭ antipation.

## CORRESPONDENCE NOTES.

DEAR SIR,—“ULO, *Greatest seen*,” is certainly not right (see page 144); neither is “AJO, *Work*,” entirely correct. The one is a *person*, and the other a *thing* denoted by the root, which is, in the one case, often adjectival, and in the other verbal. The Text-Book’s definition of *ulo* as “one remarkable for” is somewhat exaggerated. *One possessing the quality of* would be better (page 48).

The Text-Book does not give EL, *out of*, among the prepositions.

I take—AJO to be adapted from the French—AGE, to which it corresponds in pronunciation and, to a certain extent, in meaning.—Kore samideane,  
JOHN B. SHIPLEY.

P.S.—Sokta lingvo !!!

The Editor is indeed vexed that such a ridiculous slip should have remained uncorrected.

He hastens to assure Readers that this is no new rival to Esperanto, but a delightful speech to be found north of the Tweed (Skota).

*Multaj* and *Multe da* have given rise to several queries. They are alternative expressions for the English *Many*. Dr. Zamenhof apparently disliked the dismal series of—*ajn—ajn—ojn—ajn* which frequently occurs if the former method be employed, and so introduced the adverbial locution *Multe da*, wherein the *Da* does not require the Accusative case.

Mi havas multajn bonajn fidelajn amikojn malnovajn is less euphonious than Mi havas multe da bonaj fidelaj amikoj malnovaj.

DEAR SIR,—The Text-Book does not explain (except in a footnote, p. 41) the use of the Gerund after a preposition: e.g., *instead of reading*; *before returning*; etc.

Of course, the Present Participle used adjectively will not do. We must bear in mind that the *Infinitive* is a *noun*, and that it is used instead of the Gerund or Verbal Noun on the Continent. (Anstataŭ ol legi: antaŭ ol reveni).—Via vere,

C. G. STUART-MENTEATH.

Mr. Menteath continues his letter (which is too long to print *in extenso*) by reminding British Esperantists that the only way to acquire a knowledge of Esperanto entirely *free from national idioms* is to correspond frequently with those ignorant of our tongue. We wish to thank Mr. Menteath for this useful reminder, and trust that more foreign friends will make use of our monthly *Adresareto*, not only by writing to the advertisers, but by inserting their own names and special subjects.

The Passive Voice in Esperanto is most frequently expressed by the little suffix—IG, and brevity is the result. For example: This book must be read, may be either: Tiu ĉi libro devas esti legata, or Tiu ĉi libro devas legigi.

Hence verbs ending in IG are Passive by nature, and such forms as *legigita* cannot exist; only the Active Participle, *legiginta*, is admissible.

And these Passive verbs naturally cannot have a direct object, and so are followed by the Nominative case. Mi fariĝas maljuna viro, (lit.) I am getting to be an old man.

KARA SINJORO,—Kiu estis la unua Anglo kiu lernis Esperanton?

En la Adresaro Serio, No. 1, datumita 1889 (t.e., Numeroj 1 ĝis 1,000) aperas la nomoj de kvin Liverpulanaj, du Irlandanoj, unu Londonano kaj unu Essexano. Sed kiu estis la unua ne aperas. Inter ili estas Sro. R. Geoghegan, kiu estas la sama persono kiel R. H. Geoghegan, la tradukanto de la unua Zamenhofs lernolibro. Li do meritas la titolon “Patro de la Esperantistoj Anglaj.” Lia ĝusta numero estas 264.

Inter la unua milo da Esperantistoj enskribitaj en la Adresaro estis 29 Germanoj, 20 Aŭstro-Hungaroj, 10 Angloj, 6 Francoj, 4 Unuigitaj Ŝtataj Amerikanoj, 4 Svedoj, 2 Turkanoj, 1 Italo, 1 Hispano, 1 Rumano, kaj la resto (ekceptinte unu nedirita) estis Rusoj.

Signifas nenion kiu estis la unua; en Esperantujo ekzistas spaco por ĉiuj. Donu honoron al tiu, kiu plej multe laboras pri kaj por Esperanto, ne konsiderante profitojn kaj memglorigon!

Sindonema estas nia Majstro; sindonemaj estu ni! Ni danku ĉiun, kiu helpis la aferon, ĉu nemulte, ĉu multege.—Via,

JOHN ELLIS.

On the occasion of the Motor Boat-Race from Calais to Dover, the Dover Group has sent an invitation to all the northern French Groups, inviting their Members to visit them. Many favourable replies have already been received. An official reception of the Foreign Esperantists by the Mayor, Sir William Crundall (himself a Member of the Group), will be held in the Town Hall, and Mr. H. R. Geddes, Northumberland House, Dover, will be extremely glad to welcome any British Esperantists who can be present. These should arrive in Dover as early as possible on the morning of Monday, August 8th. Among others, the Editor has promised to do his best to be present on the auspicious occasion.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

Edited by H. BOLLESTON RUDIN, 47, Kensington Green Square, W.C.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Wholesale Agents: 14, Bedford Street, Strand, London, W.C.

## CONTENTS.

|   | Page  |
|---|-------|
| Editor's Page   | 101   |
| A Year's 18 Distributions (translated by<br>Maryo Womool) | 102-3 |
| WATER (Eloa Bano)   | 104-5 |
| EDUCATION (A. C. Lew)                                     | 106-7 |
| A BIRD'S PERMANENT CALENDAR<br>(Rev. R. A. Davis)         | 108   |
| YOUNG IN ESPERANTO (E. J. Laph,<br>Esq. L.D., M.A.)       | 107   |
| CLUB DISCUSSION MEETING                                   | 108   |
| ESPERANTO IN BELGICA                                      | 108-9 |
| THE "REVOLUTION" ON ESPERANTO                             | 108   |
| LOCAL ITEMS   | 100   |
| CONTENTS OF THIS PAGE                                     | 170   |
| WATER OF ORDINARY WOMAN (E.W.)                            | 124   |
| DEATH (H. Birmingham Munn)                                | 172-3 |
| WHAT DOES LITTLE DRINK SAY?<br>(A. Molokan)               | 156   |
| THE BIRD AND THE HAY (Carmen<br>Woolhill)                 | 175   |

For Local Information apply to the Hon. Secs.  
of the following Official Societies:

|  |
|--|
| BATHURST—Rev. A. T. LAM,<br>3, Coleridge Road, Bathurst          |
| BRIGHTON—Miss DAVENPORT,<br>16, Upper Bevington Road, Brighton   |
| BURTON—Rev. E. W. KINGS,<br>41, Robert Road, Burton              |
| CARLISLE—Rev. J. L. LAYTON,<br>1, Trinity Terrace                |
| DOVER—Rev. H. R. BRIDGES,<br>1, Westgate Street, Dover           |
| DUNDEE—Miss TAYLOR, M.A.,<br>3, Spence Street                    |
| FOREST GATE—Rev. E. J. W. DEAL,<br>71, Commercial Road, S.       |
| GLASGOW—Rev. J. H. WALLACE,<br>3, Hamilton Terrace, Glasgow      |
| HUDDESFIELD—Rev. G. H. TAYLOR,<br>19, South Hill Road            |
| LEEDS—Rev. W. A. JENNEN,<br>41, Park Road, Leeds, E.             |
| LEIGH—Rev. J. BLOOM,<br>1, Langton Buildings, East Street, Leigh |
| LEITH—Rev. J. E. WILSON,<br>3, Dalrymple Street, Leith           |
| LIVERPOOL—Rev. B. E. JENNETT,<br>3, Northgate Street, Liverpool  |
| LONDON—Miss LAYTON,<br>41, Upper Bevington, W.C.                 |
| NEWCASTLE—Rev. H. H. CLARKE,<br>3, Market Terrace, Newcastle     |
| PLYMOUTH—Rev. G. W. JENNEN,<br>101, Market Road                  |
| PLYMOUTH—Rev. J. H. JENNETT,<br>1, Dalrymple Street, Plymouth    |
| ST. ANDREW—Rev. J. T. HAYTON,<br>101, South Street, St. Andrew   |
| TRURO—Rev. ALAN F. HAYTON,<br>41, Park Terrace, Truro            |

W.C.—It is especially desired that contributors who are willing  
to have their names and communications published in the columns of  
"The Esperantist," will fill in the necessary particulars in the  
form enclosed.

# The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

*Just think of it!*

THE INTERNATIONAL MACHINE.

Endorsed by tens of millions.  
The common bond of union of all civilized peoples.

And nothing else can be compared with the  
Remington.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100 Broad Street, Boston, U.S.A.

# La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMASINO.

*Prezentu je Ĝo!*

LA INTERNAKTA MAŜINO.

Endorsita de miloj da homoj.  
La komuna ligilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.

La Remington estas kompara kun ĉiuj  
skribmaŝinoj.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100 Broad Street, Boston, U.S.A.

JUST PUBLISHED.

First Edition of 100,000 Copies.

## Text Book of Esperanto.

THE INTERNATIONAL LANGUAGE.

Price 1/6. Dues Free. For Foreigners Postage 1/6 per doz., 4/3 per hundred, 12/3 per thousand.  
Carriage extra.

These books can only be obtained at these prices from the Publishers—

Messrs. DIXON & HUNTING, Farringdon Press, Ltd., 100, Fleet Street, E.C.

The Various PARTICIPLES of a Verb. Ex. *Trinki* (to drink)

FUTURE O. PRESENT A. PAST I

ACTIVE PASSIVE ACTIVE PASSIVE ACTIVE PASSIVE  
TRINKONTA TRINKOTA TRINKANTA TRINKATA TRINKINTA TRINKITIS



Thousands of the owners of a Book Published by Cambridge  
The title of this Book is  
Printed at the University Press, Cambridge  
1904



# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—M. C. Gaubert, 9, rue Charras, Paris.

GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol. Podjaceskaja 24 log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

No. 11.

SEPTEMBRO, 1904.

[Subscription, 3s. Per Annum.]  
[Single Copies, 4d. net.]

Tiu ĉi estante la dekunua numero de THE ESPERANTIST, la proksima devus esti la lasta de la unua jarkolekto. Sed ne estas dezirinde komenci volumon Novembre. Estas do intencite enmeti en la unuan jarkolekton dekkvar kajerojn, t.e., ĝis Decembro, kiu numero havos la enhavnomaron kaj titolo-paĝon.

Mi do fidas, ke tiuj, kiuj abonis de la komenco, afable sendos 4 fr. 60 (anstataŭ ol 4 fr.), por ke la abonpago daŭru ĝis Decembro, 1905.

Mi ankaŭ fidas, ke miaj Aŭstraliaj, Afrikaj, Amerikaj kaj Aziaj legantoj bonvolos reaboni per frua poŝto.

Inter tre afablaj leteroj pri mia laboro, estas unu de nia bonekonata Rusa samideano, S<sup>ro</sup> Kofman. Li skribis: "Mi ne volas preterlasi la okazon por tie ĉi esprimi mian admiron, inspiratan de via gazeto, THE ESPERANTIST. La malgrandaj rakontoj havataj en ĝi estas bonegaj, kaj la versaĵoj (precipe en la lasta numero) estas perfektaj, kaj la Gazeto faras veran impreson de serioza kaj diligenta laboro, kondukata de mano forta kaj vira. Mi tutkore deziras al vi havi baldaŭ la eblon grandigi la amplekson de THE ESPERANTIST, kaj oftigi ĝian aperon, por la plezuro de viaj legantoj kaj de ĉiu bona Esperantisto."

Mi korege dankas S<sup>ro</sup> Kofman, kaj mi estas ĉiam preta por fari tion, kion deziras miaj legantoj. Sed ĝi ne estas ankoraŭ plenumigebla. Oni devas memori, ke mi estas la sola, senhelpa, Redaktoro kaj mi devas konfesi ke dek ses paĝoj estas sufiĉaj por okupigi mian libertempon. Sed, se Esperantistoj bonvolos reaboni, verki artikolojn, kaj varbi abonantojn, mi esperas pligrandigi ĝin post la fino de 1904.

This being the eleventh number of THE ESPERANTIST, the next should be the last of the first annual series. But it is not desirable to commence a volume in November. It is, therefore, intended to include in the first series fourteen numbers, i.e., till December, which issue will contain the index and title-page.

I trust, therefore, that those who subscribed from the beginning will kindly send 3s. 6d. (instead of 3s.), so that the subscription may run till December, 1905.

I also trust that my Australian, African, American, and Asiatic readers will renew their subscriptions by an early post.

Amongst the very kind letters about my work is one from our well-known Russian friend, M. Kofman. He writes: "I do not wish to let the opportunity slip for here expressing my admiration, inspired by your gazette, THE ESPERANTIST. The short stories therein contained are excellent, and the verse (especially in the last number) is perfect, and the Gazette conveys a genuine impression of serious and diligent work, guided by a strong and manly hand. I heartily hope you will soon have power to increase the dimensions of THE ESPERANTIST, and make its issue more frequent, for the pleasure of your readers and of every good Esperantist."

Most heartily do I thank M. Kofman, and I am ever ready to do what my readers wish. But it cannot yet be accomplished. One must bear in mind that I am the sole Editor, without assistance, and I must confess that sixteen pages are sufficient to fill up my leisure. But, if Esperantists will renew their subscriptions, write articles, and recruit Subscribers, I hope to enlarge it after the close of 1904.

## STRUT-MAKLERO.

De H. G. Wells. Tradukita de Martyn Westcott.

“Parolante pri la kosto de birdoj, mi vidis struton, kiu kostis tri cent librojn,” diris la taksidermisto, memorigante sian vojaĝplanan junecon. “Tri cent librojn!”

Li min rigardis supre siaj okulvitroj. “Mi vidis alian, kiun oni refuzis je kvar cent!”

“Ne,” li diris, “ne estis pro imagaj punktoj. Ili nur estis ordinaraj strutoj. Iom difektitaj ankaŭ, pro malbona dieto. Kaj ne malgrandigo de la postulo ekzistis. Oni estus pensinta ke kvin strutoj vendiĝus je malalta prezo sur vaporsipo de la Orientaj Hindujoj. Sed la allogo estis, ke unu el tiuj strutoj estis glutinta diamanton.”

“La bienulo estis Sir Mohini Padishah, dandon de Piccadilly<sup>1</sup> oni nomus lin je vido, kun malbela kapo nigra, kaj grandega turbano, en kiu estis tiu diamanto.”

“La birdo subite ekmordis kaj posediĝis je ĝi, kaj, kiam la viro koleriĝis, la birdo, mi supozas, komprenis, ke ĝi estis aginta malprave, kaj vagis inter la aliaj por resti nekonata!”

“Ĉio okazis dum unu minuto. Mi alvenis inter la unuaj, kaj jen tiu idolano alvokante siajn diojn, kaj du maristoj kaj la viro kiu zorgis pri la birdoj, laŭtege ridantaj.”

“Kiel ridinde li estis perdinta juvelon!”

“La zorganto ne ĉestis ĝuste je la momento, kaj li ne sciis, kiu estis la birdo.”

“Tute perdata, vi komprenas!”

“Mi ne malĝojigis multe, por diri la veron. La dando estis fanfaroninta pri sia diamanto de tiam, kiam li enŝpiris. Tia afero rapidege disvastigas sur ŝipo. Ĉiuj paroladis pri ĝi. Padishah mal-supreniris por kaŝi siajn sentojn. Je vespermango, li porke mangis ĉe aparta tablo, kune kun du aliaj Hindoj. La ŝipestro kvazaŭ mokadis je li, kaj li troe ekcitiĝis. Li sin turniĝis kaj babiladis en mian orelon: Li ne aĉetus la birdojn; li ja havus sian diamanton! Li demandis siajn rajtojn kiel Brita regnano! Lia diamanto devus troviĝi! Decidega li estis pri tio. Al la ‘House of Lords’<sup>2</sup> li alvokus.”

“La birdzorganto estis unu el tiuj malkleruloj, kiuj neniel ricevas novajn ideojn. Li rifuzis ĉiajn proponojn por doktori la birdoj per kuraciloj. Liaj ordonoj estis, ke li nutru ilin laŭ tiu maniero, kaj ke li agu je ili tiamaniere, kaj li forsendiĝus, se li ne nutrus kaj agus je ili laŭordone.”

“Padishah estis dezirinta stomak-pompilon-sed oni ne povas uzi tion je birdo, kiel vi scias! Tiu ĉi Padishah estis plena je malbona legoscienco kiel la plimulto de Bengalaj, kaj paroladis pri garantiaĵo je la birdoj, kaj tiel plu.”

“Sed maljunulo, kiu diris ke lia filo estis advokato en Londono, argumentis, ke tio, kion birdo glutis fariĝis *ipso facto* ero de la birdo, kaj ke la sola rimedo de Padishah estis procesigi kaj ke eĉ tiam oni eble povus pruvi malatenton liaflanke. Li tute ne havis irpermeson ian en struto, kiu ne apartenis al li.”

“Tio treege maltrankviligis Padishah, des pli ke ni preskaŭ ĉiuj opiniis, ke tio estis rezona.”

“Ne estis advokato sur la ŝipo por decidi la aferon, kaj ni ĉiuj libere babiladis.”

“Fine, post Aden, ŝajnas ke li ekkonsentiĝis je la ĝenerala opinio, kaj private vizitis la birdzorganto kaj proponis prezon por ĉiuj la kvin strutoj.”

“La proksiman matenon, estis grandega malpaco ĉe matenmango. La zorganto ne havis permeson por vendi la birdojn, kaj tute nenio igus lin vendi ilin; sed ŝajnas ke li diris al Padishah, ke Eŭrasiano, nome Potter, jam estis farinta proponon; je tio Padishah denunciis Potter antaŭ ĉiuj.”

“Sed mi kredas ke ni preskaŭ ĉiuj pensis, ke Potter estis iom lerta, kaj mi scias ke, kiam Potter diris, ke li estis telegrafinta de Aden al Londono, por aĉeti la birdojn, kaj ke li ricevus respondon ĉe Suez, mi malbenegis je tia perdita okazo!”

“Ĉe Suez, Padishah sin cedis je larmoj, veraj malsekaj larmoj, kiam Potter ekposedis la birdojn, kaj li tuj proponis pagi ducent kvindek librojn pro la kvin, tio estante pli ol ducent procent je tio, kion Potter estis paginta.”

“Potter diris ke neniel li fordonus eĉ plumon, kaj ke li intencis mortigi ilin unuope kaj trovi la diamanton: sed poste, pripensinte, li iom kompreneble. Li estis vetema hundo, tiu Potter, iom malhonesta je kartludo, kaj tia hazarda afero multege plaĉis lin eble. Li do ŝerce proponis aŭkcio vendi la birdojn, malkune al apartaj homoj, je unua prezo da £80 po birdo. Sed unu birdon, li diris, li intencis gardi ‘pro ŝanco.’”

“Vi devas kompreni, ke tiu ĉi diamanto estis multekosta; malgranda Hebreo, diamanta mak-

leristo, taksis ĝin je tri aŭ kvar mil librojn, kiam Padishah ĝin estis montrinta al li, kaj tiu ĉi ideo de vetludo en strutoj sukcesegis. Nu, okazis ke mi estis parolinta pri ĝeneralaj aferoj kun la bird-zorganto, kaj tute ŝance, li estis dirinta, ke unu birdo malsaniĝis, kaj ke li supozis, ke ĝi havis dispepsion. Ĝi havis en sia vosto, unu preskaŭ blankan plumon, per kio mi rekonis ĝin. Tiel, kiam, je la proksima tago, la aŭkciado komencis per ĝi, mi plialtigis la okdek kvin librojn de Padishah je kvin. Mi kredas, ke mi estis iom tro certa kaj avida pri mia plipropono, kaj iuj aliaj divenis, ke mi ion sciis! Kaj Padishah penegis por akiri tiun birdon, simila je frenezulo. Fine, la Hebreo negocisto akiris ĝin por £175. Kaj Padishah kriis £180 ĵus post la malsupreniro de la martelo (tiel Potter anoncis).

“La Hebreo do akiris ĝin, kaj tiam kaj tie li prenis pafilon kaj mortigis ĝin.

“Potter multege koleriĝis, tial ke li diris, ke tio ĉi malhelpus la vendon de la aliaj tri; ankaŭ Padishah kondutis sin kiel idiotulo: sed ni ĉiuj ekscitegis. Mi povas diri al vi, ke mi multege ĝojis, kiam tiu ĉi dissekcio finiĝis, kaj nenia diamanto troviĝis—multege mi ĝojegis! Mi estis proponinta £140 mi mem!

“La malgranda Hebreo estis tiel, kiel la plej multe da Hebreoj; li ne koleriĝis pro malbona ŝanco: sed Potter rifuzis daŭrigi la aŭkciaĵon antaŭ ol ĉiuj kunsentis, ke la komercaĵo ne liveriĝus antaŭ la fino de la vendado. La malgranda Hebreo deziris argumenti, ke la okazo estis escepta, kaj, ĉar la diskuto progresis egale, la afero estis prokrastita ĝis la proksima mateno. Ni estis vivemaj ĉe vespermanĝo, tiun vesperon, mi vin certigas! Fine Potter venkis, ĉar, kompreneble, li estus sendanĝera se li gardus ĉiujn la birdojn, kaj ni ŝuldis al li iom da ŝatateco pri lia sportema konduto. Kaj la maljunulo, kies filo estis advokato, diris, ke li estis pripensinta la aferon, kaj ke li multe dubis, kiam birdo estis malfermigita kaj la diamanto eltrovita, ĉu ĝi ne devus esti redonata al sia propra bienulo.

“Mi memoras, ke mi proponis, ke ĝi vere submetiĝis je la leĝoj de trezor-trovo, kio estas efektive la vero pri la afero. Estis varmega disputo, kaj ni decidis, ke certe estus malsaĝe mortigi la birdojn sur la ŝipo. Tiam la maljunulo, tro-grandigante per parolado leĝoscienca, penis pruvi, ke la vendo estis loterio, kaj kontraŭ la leĝoj; li demandis la ŝipestron pri tio; sed Potter diris, ke li vendis la birdojn kiel strutoj. Li ne volis vendi diamantojn, li diris, kaj ne ĝin proponis kiel allogon. La tri birdojn li vendus kiuj, laŭ lia plena kredo kaj opinio, ne enhavis diamanton! Tio ĉi li esperis estis en la unu, kiun li gardus.

“Grandegaj prezoj oferiĝis tute same je la

proksima tago. La fakto, ke estis nur kvar hazardoj, anstataŭ kvin, kompreneble igis plialtigon de la kosto. La birdoj vendiĝis je meza prezo de £227, kaj, sufiĉe strange, tiu ĉi Padishah ne ricevis unu—*ne eĉ unu!*

“Li tro koleriĝis, kaj kiam li devus esti pliproponinta, li babilis pri garantiaĵoj, kaj, plie, Potter malhelpis lin.

“Unu birdo aĉetiĝis de malgranda kvieta oficiro, alia al la malgranda Hebreo, kaj la tria sindikatigis je la inĝenieroj.

“Tiatempe Potter subite ŝajnis malĝoja pro la vendado, kaj diris, ke li estis forĵetinta tute mil librojn, kaj ke verŝajne li tirus nulon; ke li ĉiam estis simplanimulo. Tamen, kiam mi ekparolis kun li pri asekurado kontraŭ perdo je lia lasta hazardo, mi ekleruis, ke li jam estis vendinta la rezervitan birdon al politikisto,—viro kiu lernadis la Hindajn etikojn kaj Socialajn aferojn dum sia libertempo.

“Tiu lasta estis la £300 birdo!

“Nu, tri benataj estaĵoj elŝipiris ĉe Brindisi—kvankam la maljunulo opiniis, ke estis kontraŭ la limdepaĝaj impostoĵoj. Potter kaj Padishah ankaŭ elŝipiris.

“La Hindu ŝajnis preskaŭ frenezigi kiam li vidis sian diamanton irantan tien ĉi kaj tien, kvazaŭ. Li rediradis, ke li havigus legan ordonon (li ja havis legan ordonon je la cerbo) kaj li donis lian nomon kaj adreson, tial ke oni sciu kien sendi la diamanton. Kompreneble neniu deziris lian nomon kaj adreson, kaj neniu donis la sian.

“Estis tumulto, mi certigas al vi, sur la trotuaro. Ĉiuj foriris per malsamaj vagonaroj.

“Mi daŭrigis ŝipe ĝis Southampton, kaj mi tie vidis la lastan birdon kiam mi elŝipiris. Ĝi estis tiu de la inĝenieroj, kaj ĝi staris apud la ŝiponto en skatolego, kaj aperis tiel krurema kaj malsaĝa ejo por multekosta diamanto, kiel vi iam vidis!”

“Kiel ĝi finiĝis?”

“Ho! Tiel! Nu! oble . . . Jes! estas unu alia afero, kio eble iom klarigos. . . . Post mia elŝipigo, mi estis en Regent Street komercante, kaj jen! brako ĉe brako, kaj ĝuantaj luksegan tempon, *Padishah kaj Potter!* Se vi pripensadas pri ĝi. . . .”

“Ho jes! *Mi* opiniis tion! Sed, vi komprenas, ekzistas nenian dubeton ke la diamanto estis vera diamanto. Kaj Padishah estas eminenta Hindu. Mi vidis lian nomon en ĵurnaloj—*ofte!*

“Sed ĉu la *birdo glutis* la diamanton estas, kiel vi diras, ja alia afero!”

<sup>1</sup> Londona strato fama pro dandoj. <sup>2</sup> Brita reg. ĉambro de la nobeloj.

## H A V R O .

Elise Bauer.

Ĉu vi neniam estis en Esperantujo? Nu, rapidu iri tien, ĝi estas la plej bela lando sub la suno; ĝi estas la vera, longe revita, kaj fine eltrovita utopio.

Tie vi trovas fratojn kunigitajn per komuna lingvo, per komunaj ideoj. Libereco, frateco, egaleco, laŭ la vera senco de la vortoj, regas tie.

Sed kie estas tiu ĉi feliĉa lando?

Ĝi estas ĉie, kie Esperantisto renkontas Esperantiston.

Mi ĵus forlasis Esperantujon, kaj mi plezure donas al vi la priskribon de la tagoj, kiujn mi pasigis tie.

La Havraj Esperantistoj afable invitis siajn Anglajn samideanojn viziti ilin; kaj grupanoj de diversaj partoj de Anglujo saĝe sekvis tiun ĉi amikan vokon. Certe neniu el ili iam bedaŭros la decidon, ĉar, dank' al la afablegeco de niaj invitintoj, ni ja estis tre kontentaj.

Vendredon, la 29<sup>an</sup> de Julio la kunvojaĝantoj kolektiĝis ĉe la stacidomo de Waterloo, en Londono. La vagonaro rapide forportis nin al Southampton, kie la vaporsipo estis jam preta al forveturo. Estis noktomezo kiam ni forlasis la havenon. Bela, trankvila nokto, tro bela por malsupreniri en la varmegajn kajutojn. Ni do kunsidas en angulo sur la ferdeko kaj paroladas, babiladas, ŝercas, kompreneble Esperante.

Ni jam estas en Esperantujo. Tiamaniere kelkaj horoj pasas agrable kaj rapide. Sed komencas iom malvarmiĝi; ni ankaŭ memoras, ke ni bezonas forton por la sekvanta tago. Ni do decidus serĉi niajn kuŝejojn.

Sed jam frue matene ni denove retrovas unuj la aliajn sur la ferdeko, kaj ĝuas la freŝan aeron kaj la varmetajn radiojn de la leviĝinta suno. Baldaŭ la marbordo de Francujo estas videbla. Malrapide ni alproksimiĝas Havron.

Estis ĉirkaŭ la sesa horo matene.

Amaso da personoj jam kolektiĝis sur la elŝipejo. Manoj, tukoj, ĉapoj estas svingataj.

Feliĉuloj! mi pensis kun iom da envio: Feliĉuloj kiuj, revenante en la patrujon, estas jam senpacience atendataj de parencoj, amikoj! Por ni tiu ĉi estas fremda lando, neniu amike nin atendas!

Ha! sed kio estas tio? Kio estas la verdaĵo videbla inter la multaj blankaj tukoj? Estas verda kovrilo, jes, ne plu dubo, ĝi estas la al ni bone konata verda kovrilo de *The Esperantist*. Ĝojo! Estas do ni, kiujn oni jam amike atendas.

Multe tro malrapide ŝajnas nun al ni la veturado

de la ŝipo, kaj la alteriĝo. Fine ni povas forlasi la ŝipon, per la transjetita ponto, kaj premi la manojn de niaj gentilaj samideanoj, kiuj tiel afable venis tiel frue por doni al ni la bonvenon.

Estas vere mirinde kiel rapide oni konatiĝas kune, kaj trovas temon por interparolado, se oni nur havas komunan lingvon.

Niaj nove trovitaj amikoj, Sinjorinoj kaj Sinjoroj, akompanis nin ĝis la Grand Hotel de Normandie (Esperantista hotelo tre komforta) kie ni disiĝis kun la promeso reenkontiĝi baldaŭ. Iom poste, kelkaj sinjoroj venis por fari kune kun ni promenadon tra la urbo kaj laŭlonge la marbordo.

Posttagmeze multaj sinjorinoj kaj sinjoroj kunvenis en nia hotelo, kaj kune kun ili, ni multe ĝuis la ekskurson al la lumturoj. Tiu ĉi levigas sur promontoro, je ne tro granda malproksimeco de la urbo. Ni iris tien parte trame, kaj parte piede. De tiu ĉi punkto oni havas tre belan vidon sur la urbon kaj la kontraŭan promontoron, kun diversaj marbanlandoj.

Alveninte sur la altaĵo, ni sidigis sur la herbo, kaj, malgraŭ la pluvo, kiu komencis fali, regis granda kora ĝajeco inter la kolektiĝaro. Oni babiladis, ŝercis, kantis unue la Britan nacian himnon, kies tradukinto estas ja Havrano (S<sup>ro</sup> E. Legoffre, la sindonema Sekretario de la Grupo) poste la Esperantigitan *Marseillaise*, kies tradukinto malfeliĉe ne ĉeestis. Niaj Francaj amikoj multe ŝatas lian verkon.

Ŝajnis ke eĉ la Pluvdio estis frapita je miro, aŭdante la malnovan kanton en la nova lingvo, ĉar momente li tute ĉesigis sian okupon; malfeliĉe li komprenis nian lingvon nur tro rapide, kaj denove komencis la verŝado. Sed tio ĉi ne ĝenis nin, tute ne.

Ni facile trovis rifuĝejon, kaj ĝaje atendis la revenon de la suno, kiu, vidante nian nezorgecon, baldaŭ reaparis, kaj nun ni denove reiris en la urbon.

Je la sama vespero, granda kunveno de Esperantistoj havis lokon en la bela Urbestrejo.

S<sup>ro</sup> Ducros, Vic-Prezidanto de la Grupo, donis la saluton de bonveno al la Anglaj Esperantistoj, kaj al S<sup>ro</sup> Fruictier, Ĉefredaktoro de la *Lingvo Internacia*, kiu estis alveninta de Parizo por partopreni en la internacia kunveno. S<sup>roj</sup> Bolingbroke Mudie kaj Reeve elektigis Honoraj Membroj de la Grupo. Poste oni prezentis nin al

multaj Havraj grupanoj, kiujn ni ne estis ankoraŭ vidintaj, kaj la interparolado fariĝis pli kaj pli viva.

Ekstere la elementoj estis en granda tumulto, pluvis, tondris, fulmis; sed interne regis perfekta harmonio kaj paco.

La sekvantan matenon, niaj amikoj venis nin trovi denove sufiĉe frue por montri al ni kelkajn vidindaĵojn de ilia bela urbo. Ni vizitis la ĉefpreĝejon kaj la museon, kaj promenadis sur la tiel nomata "Promenade," la kolektiĝejo de la Havranoj.

Tagmeze granda festeno kunigis nin ĉe la hotelo. Ĉirkaŭ kvindek samideanoj kunsidis.

Ankaŭ la Brita Konsulo, S<sup>ro</sup> Soulsby Rowell, ĉeestis. Estis ĝajega kolektiĝo.

S<sup>ro</sup> Ducros denove esprimis en varmaj vortoj sian plezuron vidi nin siajn gastojn. S<sup>ro</sup> Bolingbroke Mudie, je la nomo de la Anglaj Esperantistoj, dankis por la korega akcepto farita al ni. Ankaŭ S<sup>ro</sup> Fruictier faris paroladon, kaj mi diris kelkajn vortojn. Poste, oni kantis la du naciajn himnojn, oni deklamis bonegajn poemojn, seriozajn kaj humorajn, oni kantis aliajn Esperantajn kantojn, oni ludis Esperantan Valson, k. t. p. Kaj violonoj kaj klarnetoj plibeligis la efekton.

Unuvorte ni amuzis nin multege, kaj la tempo forflugis tro, tro rapide.

Vespere ni kune supreniris, per ŝnurega fervojo, sur "La Côte," bela vojo super la urbo kie ni fotografiĝis, kaj de kie ni admiris la belan vidaĵon. Estis jam malfrue kiam ni revenis en nian hotelon, eble iom laĉaj, sed tre kontentaj.

Venis nun la lasta tago de nia plezurplena vizito.

Oni afable estis aranĝinta ekskurson en la najbara marbanurbo Trouville (kiujn ni ŝerceme nomis Truurbo) la kolektiĝejo de multaj Parizanoj dum la somero. La transiro trans la estuario de la

Seine daŭras ne pli ol duonon da horo. Ni pasigis tre feliĉan tagmezon en la bela urbeto, promenante kaj sidante konk-ludante sur la sablaĵo. Diversaj humoraj fotografiaĵoj nun rememorigas pri tio.

Sed nun bedaŭrinde la horo de la disiĝo alproksimiĝis, ĉar la plimulto el la Anglaj Esperantistoj intencis reveturi Anglujon la saman nokton.

Ĝis la lasta minuto niaj Havraj samideanoj zorgis pri ni, ĝis la lasta minuto ni ĝuis la plezuron kune kun ili.

Sed ni devis disiri. Kun malĝojo ni forlasis la gastaman urbon, sed en niaj koroj vivas la espero, ke la amikeco naskita kaj kreskita dum la multaj lastaj tagoj fariĝos pli kaj pli firma, en niaj koroj estas la konvinko, ke nia laborado ne estas vana, ni ja jam vidis kelkajn belajn fruktojn.

Nia komuna lingvo jam kunigas la diverslandajn batalantojn per frata spirito. Koran, koregan dankon al niaj Havraj amikoj, kies varma akcepto inspiras nin je nova kuraĝo, je nova fervoro.

Kelkaj el ni daŭrigis la vojaĝon al Roueno.

Jam en Havro ni havis la plezuron konatigi kun la sindonemaj Sekretarioj, S<sup>roj</sup> Boulet kaj Gehet, kaj ili tuj invitis nin viziti ankaŭ sian grupon.

Tie ni trovis la saman koran akcepton, kaj ni pasigis tre feliĉajn horojn inter la tieaj samideanoj. Ĝis nun, ni ne estis rimarkintaj, ke ni trovis nin en fremda lando, kaj efektive, tio ĉi ja ne estis la okazo, ĉar ni ĉiam estadis en Esperantujo, nia komuna patrujo. Nur kiam ni estis forlasintaj niajn samideanojn la sento ke ni estas nun inter fremduloj iom subpremias nin.

Nu! Esperantistoj, kiam vi havis libertenon kaj ne scias kie pasigi ĝin, ne ŝanceliĝu! Iru rekte en ian provincon de Esperantujo. Tie vi estos bonvena, vi trovos sincerajn amikojn, kaj vi revenos pli fervora Esperantisto ol iam antaŭe.

## BRUSELO.

G. C. Law.

### ESTIMATA SAMIDEANO,

Lastan lundon mi revenis de mia unua vizito en Esperantujo, aŭ alivorte en Bruselon. Kaj mi pensas ke vi ŝatos mallongan skizon pri miaj aventuroj.

Unue, mi ne povas paroli France, tial mia tuta parolado estis Esperante.

Mi havas korespondanton en Bruselo, kiu tiun ĉi someron donis al mi koran inviton al sia urbo. Do, kun iom da tremado, mi forveturis kaj

sendanĝere atingis Ostendon, kaj metenfrue alvenis Bruselon.

Mi saltis el la malbela kupeo de la vagonaro, kaj tuj ekvidis viron, kun steleto en butonruo. Ni intersalutis, kaj mi facile komprenis lin. Komprenoble mi unue estis timema, sed post ne longe mi paroladis preskaŭ tiel facile kiel Angle. Jaŭdon, la 4<sup>ta</sup> de Aŭgusto, vespere, estis kunveno de ĉirkaŭ dudek samideanoj, inter kiuj estis S<sup>roj</sup> Rhodes kaj Ellis el Keighley, kaj S<sup>ro</sup> Reycheff el

Bulgarujo. Sub bela stelluma ĉielo ni ĉirkaŭe sidis ĉe tabloj en kafejo, kaj la aero estis plenigita per Esperantaj ŝercoj kaj paroladoj. Mi ofte legis pri la bonamikeco de fremdaj Esperantistoj, kaj mi sentis tre kortuŝita, kiam mi mem ankaŭ konatigis kun tiuj ĉi fervoraj kunbatalantoj. Ĉiam kaj ĉie inter la Esperantistaro mi trovis amikojn, ne, fratojn; kaj ofte mi silente dandis D<sup>ro</sup>n Zamenhof pro lia mirinda eltrovaĵo.

La Belgoj multe miris, ke la Angloj parolas kun la sama akcento. Ili pensis ke Angloj ne povus sukcese fari ĝin.

La postan tagon ni vizitis la batalkampon de Waterloo. Tie ĉi ni multe mirigis la kelnerojn kaj gvidistojn, kiuj ne povis kompreni nian Esperantan lingvon. La komuna opinio estis, ke ni estis Hispanoj.

En Bruselo, ĉiutage, mia mastro kaj mi vizitis la

vidindaĵojn de la urbo, kaj li klarigis al mi per Esperanto multajn aferojn. Nenio estis nekomprenebla al mi, kaj mi nun posedas bonan scion de Bruselo.

Nun, mi havas respondon al niaj kontraŭbatalantoj. Mi estas certa, ke Esperanto estos sukceso, ĉar mi, la unua Angla Esperantisto viziti Bruselon, kiu neniam ricevis Esperantan lecionon, povis kun paroli kaj ankaŭ kompreni ĉiujn facile. Eble mia Esperanto ne estis ĉiam korekta, kelkafoje mi devis paroli senpripense, tamen mi trovis ke parolado estis la plej bona metodo por lerni nian lingvon. Ĝi estis, miaflanke, deviga parolado!

Mi esperas ke mi, per mia babilado, ne enuigas vin.

Sincere via,

G. C. LAW.

## FACILA ETERNA KALENDARO.

Elpensita de Rev. R. A. Davis.

Ekrigardo je la Almanako montros, ke la tago de la semajno, je kiu komencas la jaro, falas ankaŭ sur la 5<sup>a</sup> de Februaro, la 5<sup>a</sup> de Marto, la 2<sup>a</sup> de Aprilo, la 7<sup>a</sup> de Majo, la 4<sup>a</sup> de Junio, la 2<sup>a</sup> de Julio, la 6<sup>a</sup> de Aŭgusto, la 3<sup>a</sup> de Septembro, la 1<sup>a</sup> de Oktobro, la 5<sup>a</sup> de Novembro kaj la 3<sup>a</sup> de Decembro en ĉiu jaro, escepte en la super-jaro (Leap-year).

Se oni povas memori, ke T=1, L=2, M=3, N=4, R=5, S=6, J=7, oni povas facile memori ankaŭ la daton de la monato sur kiu ĉiu tago de la semajno falos.

Por memori la valorojn de la numeroj, estos bone memori la sekvantan frazon, kiu enhavas la literojn laŭvice: *Tiu Lasta Monato Neniam Rememorigas Someran Julion (This Last Month Never Recalls Summery July).*

T (1) estas vidata en OkTobro, L (2) en ApriLo kaj JuLio, M (3) en SepteMbro kaj DeceMbro, N (4) en JuNio, R (5) en FebruaRo, MaRto, kaj NovembRo, S (6) en AŭguSto, kaj, laste, J (7) en MaJo.

Estos ankaŭ plifaciligo memori ke, je tiu ĉi sistemo oni nur kalkulas la literojn de la antaŭlasta (akcentata) silabo de la monato-nomo.

Nenio estas pli simpla!

Oni devas sin kutimiĝi paroli pri la jaro per la nomo de la unua tago de Januaro.

Ekz. 1903 estis "Ĵaŭda-jaro" ĉar Jan. 1<sup>a</sup> estis Ĵaŭdo. Sekve Feb. 5<sup>a</sup>, Mar. 5<sup>a</sup>, Apr. 2<sup>a</sup>, Maj. 7<sup>a</sup>, Jun. 4<sup>a</sup>, Jul. 2<sup>a</sup>, Aug. 6<sup>a</sup>, Sept. 3<sup>a</sup>, Oct. 1<sup>a</sup>, Nov. 5<sup>a</sup>, kaj Dec. 3<sup>a</sup> estis ĉiuj Ĵaŭdoj.

Simile 1905 estos "Dimanĉa-jaro," ĉar Jan. 1<sup>a</sup> estos Dimanĉo. Sekve Feb. 5<sup>a</sup>, Mar. 5<sup>a</sup>, Apr. 2<sup>a</sup>, k.t.p., estos ĉiuj Dimanĉoj.

De tiu ĉi oni povas kalkuli la daton de ia tago de la semajno, aŭ la tagon de la semajno sur kiu ia dato falos je ia jaro; ĉar 1905 estos "Dimanĉa-jaro," 1906 "Lunda-jaro," 1907 "Marda-jaro," kaj 1908 estos "Merkreda-Ĵaŭda-jaro." Ĉar tiu jaro estos super-jaro.

Tiu ĉi jaro (1904) ankaŭ estas superjaro, kaj oni devas nomi ĝin "Vendreda-Sabata-jaron" ĉar ĝi komencis je Vendredo, kaj Feb. 5<sup>a</sup> sekve estis ankaŭ Vendredo. Sed Mar. 5<sup>a</sup>, Apr. 2<sup>a</sup>, k.t.p., estis *Sabatoj, ne Vendredoj*, ĉar Februaro enhavis unu tagon pli ol la ordinara nombro.

Tial oni vidas ke, en la superjaro, Mar. 5<sup>a</sup> ne estos la sama tago de la semajno kiel Feb. 5<sup>a</sup>, sed la sekvanta tago. Kaj tio ĉi estas montrata per la duobla nomo: "Vendreda-Sabata-jaro" aŭ, en 1908, de "Merkreda-Ĵaŭda-jaro."

Estas rimarkinde ke tiu ĉi sistemo ne postulas ian ŝanĝeton je la nomoj de la monatoj en Esperanto. Ĉu Doktoro Zamenhof sciis tion, kiam li elektis tiujn nomojn?

## LA ESPERANTAJ VOKALOJ.

Origine verkita de R. J. Lloyd, D. Lit., M.A.

Nia bona Redaktoro, sciante ke mi estas la ĉieca instruisto pri la Scienco de Fonetiko, kaj sciante ankaŭ ke mi estas kora amiko de la Esperanta lingvo, petis min, lastan monaton, skribi artikolon pri la fonetika karaktero de tiu lingvo, komparanta ĝin al tiu de aliaj bonkonataj lingvoj de la mondo.

Sed mi trovas ke la temo estas iom tro granda por unu artikolo.

Mi skribos tial, tiun ĉi fojon, nur pri la vokaloj.

Tie ĉi, tiel kiel en ĉiu alia parto, la karaktero de la Esperanta lingvo estas tiu de saĝa simpleco.

La fonetikaj scienculoj diras, ke la tri vokaloj la plej distingitaj, kiujn la homaj organoj povas produkti, estas I, U kaj A (kiam oni elparolas ilin laŭ la pura Esperanta maniero).

Inter I kaj A oni trovas tiam E; kaj inter U kaj A oni trovas simile O. Oni havas tiam kvin ĉefajn vokalojn, kiujn oni skribas ofte tiamaniere:—

|   |   |
|---|---|
| I | U |
| E | O |
| A |   |

por signifi iliajn rilatojn.

Tiuj ĉi kvin vokaloj estas la plej klaraj, kiujn homo povas fari.

Ili estas tial la plej uzataj el ĉiuj.

Tio estas granda helpo por la disvastigo de Esperanto. Ĉar ekzistas apenaŭ iu nacio, kiu ne havas tiujn ĉi kvin vokalojn en sia propra lingvo. Estus granda malhelpo, ĉe iu nacio, al la lernado de Esperanto, se antaŭ ol lerni la Esperanton, estus necese lerni kelkajn fremdajn vokalojn.

Kaj kvin vokaloj estas sufiĉaj: la Esperanta vortaro estas la pruvo de tio.

Tio fakto estas ankoraŭ granda bonaĵo kaj helpado por Esperanto. Ĉar la studento, kiu komencas lerni la Anglan lingvon devas lerni pli ol dekdu, pliparte fremdajn, vokalojn: kaj estas same ĉe la Franca aŭ la Germana lingvo.

Kaj memoru, ke estas multoble pli facile lerni la kvin, ol lerni la dekdu, ĉar iliaj diversecoj estas multe pli klaraj kaj frapantaj.

Doktoro Zamenhof montris per nenio pli, ol per sia elekto de tiuj ĉi kvin vokaloj, sian delikatan sentadon de la universalaj bezonoj de la homa parolado. Tiuj ĉi kvin vokaloj estas nur fremdaj al tre malgranda nombro da homoj. Sed se la Doktoro estus preninta sesan vokalon, estus

estinta preskaŭ neeble eviti vokalon, kiu estus estinta fremda al multaj.

Sed ĉe la elektado de vokaloj ekzistas ne nur tiuj ĉi naciaj aŭ (oni povus diri) geografiaj danĝeroj, sed ankaŭ historia danĝero kies ĉeeston niaj karaj kunbatalantoj ĝis nun apenaŭ suspektas: ĉar ĝi bezonas tempon por sin elvolvi.

La naciaj lingvoj estas ĉiam en stato de nesentebla sed neĉesanta ŝanĝado.

Prenu nian Anglan lingvon kiel ekzemplo.

Se oni renkontus *Shakespeare* hodiaŭ, kaj aŭdis liu paroli, estus treege malfacile kompreni lin; kaj aŭdante Chaucer, oni kredus aŭdi, ne Anglan, sed kelkan alian tute fremdan lingvon.

Kaj, kiam la lingvo estas larĝe disvastiginta, ĝi ŝanĝas diverse en diversaj lokoj. Fine la diversecoj fariĝas tiel grandaj, ke la popolo de la unu loko ne komprenas plu la paroladon de la popolo de alia loko: ekzemple en Francujo kaj Hispanujo. Kaj, post tio, ne estas plu unu lingvo, sed du.

Kaj ne estas, en la historio de la lingvoj, sola ekzemplero de la reunuiĝo de du tiaj lingvoj.

Ne ekzistas ankaŭ sola nacia lingvo en la mondo, kiu ne estas la produkto de tiu ĉi diversiganta agado.

Ĝi ŝajnas, je la unua vido, esti leĝo de naturo, nerompebla kaj nevenkebla.

Ĉu ĝi estas nevenkebla?

Mi kredas ke ne.

Kaj mi kredas, ke la ĉefa kaŭzo, kiu ĝin faros venkeblan por la Esperantistaro, estas la saĝa elekto de tiuj ĉi kvin vokaloj. Ilia povo restos ankoraŭ en ilia simpleco kaj certeco.

Ili estas la plej naturaj kaj frapantaj sonoj, kiujn la homa voĉo povas fari.

Se oni detruus ilin hodiaŭ ili reaperus morgaŭ.

Se, per malbona hazardo, iu nacio komencos paroli malkorekte la Esperantajn vokalojn, estos tute facile montri kaj pruvi al ĝi ĝian eraron. Kaj nature ĝi korektus ĝin: ĉar la fatala dubo, *Kiu el la du sonoj estas korekta?* ne povas ekzisti en Esperanto.

Tial la fonetika scienco justigas plene Doktoron Zamenhof, pri lia elekto de vokaloj, kaj justigas nin, kiam ni esperas kaj kredas, ke la puraj kaj belaj vokaloj de nia mondbenanta lingvo daŭros klare kaj brile dum la mondo ekzistos.

R. J. LLOYD.

*La Universitato, Liverpool.*

## THE PROGRESS OF ESPERANTO IN GREAT BRITAIN AND ABROAD.

*The contents of this section are supplied by the Hon. Sec. of the London Esperanto Club, who invites all Esperantists to send monthly reports of the spread of the International Language in their districts. Communications must reach 14, Norfolk Street, London, W.C., before the 8th of each month.\**

A meeting of the Committee of the London Esperanto Club was held at 100, Gracechurch Street, on Monday, 15th August, Mr. O'Connor in the chair. The chief business of the meeting was the transfer of the hon. secretaryship of the Club from Mr. H. Bolingbroke Mudie to Miss Lawrence. Mr. Mudie, who has given all his leisure time for nearly two years to the work of spreading Esperanto, made a brief statement as to the position of the Club, expressing his regret that he was unable to devote the necessary time to the work. In future he would be compelled to devote his leisure to THE ESPERANTIST and to general propaganda. He handed over to the treasurer the books and the balance of money due to the Club, amounting to £41 odd, and submitted a balance sheet showing that the total outstanding indebtedness of the Club would not amount to much more than £10, which was more than covered by debts due to the Club. The Club, in addition, holds a valuable stock of books for sale.

Mr. W. T. Stead, in moving a resolution accepting with regret the resignation of Mr. Mudie, expressed the feeling of all present in declaring that such a resolution would be incomplete without a rider declaring how grateful they were for the invaluable services which Mr. Mudie had rendered them ever since the formation of the Club. But for his zeal, industry, and intelligence the Club would never have attained its present flourishing position, nor would the prospects of Esperanto be anything like so good in England as they fortunately were that day. Only those who had been closely associated with Mr. Mudie could appreciate the labour and time which he had devoted to the work. Mr. Mudie had not only been secretary, but he had practically been treasurer, and so well had he discharged his stewardship that as hon. treasurer he (Mr. Stead) for the first time in his life had the pleasure of receiving a balance instead of being called upon to defray a deficit. (Applause).

Miss Schafer seconded the resolution, which was carried unanimously.

Mr. Mudie responded.

### *Esperanto in Belgium.*

Messrs. Rhodes and Ellis, the President and Secretary of the Keighley Society, have just returned from a circular tour round the Esperantist cities in Belgium, visiting in turn Antwerp, Brussels, Louvain, Malines, Ghent, Bruges,

Courtrai, and Liège. Notwithstanding the fact that their visit took place at a time when the activity of Esperantists is at its lowest ebb on account of the holiday season, there were abundant evidences of the progress of Esperanto in that most populous, busy, commercial country. Special meetings were arranged in their honour in Antwerp, Brussels, and Louvain. The last-named town, which has a population of about 45,000, has three sections of a Society that numbers more than 200, of whom the greater proportion can speak Esperanto with considerable facility. A means of continuing the interest of the elementary students after their first course is worth adopting more generally. The students are divided into small groups, and each group maintains its "ever-circulator," the contributions being commented upon by the individual members, and finally corrected by S<sup>o</sup> Mathys, the energetic secretary of the society. The contributors retain their anonymity. At Brussels Mr. Law, of Battersea, was present, and this unexpected *rencontre* added a pleasant surprise. Here another proof of the utility of Esperanto was forthcoming, for S<sup>o</sup> Caneff, a Bulgarian, told the meeting his experiences. He left Philipopolis to become a student of Political Economy at the Brussels University, knowing only two words of French, "moi, Bulgare," and was labelled like a parcel of goods with the address of his destination. Arriving at Brussels, S<sup>o</sup> Blanjean taught him French *by means of Esperanto*, and since then he has attended his course as a student and duly passed his examination. S<sup>o</sup> Jamin, the chief Editor of the *Belga Sonorilo*, was the life and soul of the two meetings which took place in the Belgian capital. His coadjutor, S<sup>o</sup> Seynaeve, was, however, unable to be present on account of his having arranged to take part in the Dover-Calais celebration; but he was seen at Courtrai on his return, and was full of enthusiasm on account of the successful consummation of that notable reunion. It seems that the spread of Esperanto in Belgium, except in the case of a few sporadic instances, is due to a series of letters which appeared in *Le Petit Bleu* from the pen of Lieut. Lemaire. At Antwerp one of the members has placed on the market, as a means of propaganda, cigarettes bearing the name and the green star of Esperanto as their special badge. At Ghent the group is almost entirely composed of University students, and on account of the vacation no

\* The Editor is not responsible for the opinions expressed in these Club reports.



meeting could be arranged, but S<sup>o</sup> Cogen detailed the progress of the movement in his city. The old-world beauties of Bruges were inspected under the guidance of Lieut. Lenken, and a short call was made on S<sup>o</sup> Witteryck, the publisher of *Belga Sonorilo* and the writer of an amusing book, *Kelkaj Esperantaj Floroj*, a booklet which is a very good substitute for the *Humoraĵoj*, now out of print.

The Secretary of the Liège Group is a Russian, who has conversed in Esperanto with Dr. Zamenhof himself. Amongst other things he explained how Dr. Zamenhof himself pronounces Esperanto. The phoneticism of Esperanto, he says, is not over-rigid, but allows a certain margin of variation in the case of the vowels.

The letter "o" is pronounced as in the North of England, the excessive roundness of the South country pronunciation being avoided. The "a" is also an open vowel, not always so open as the "a" in father, but never so close as the "a" in the pronunciation which the London Board School children make use of in the word "cat." "Estas" is pronounced as an Englishman would pronounce it if he had never heard of Esperanto; not quite so pedantically as "aystahs."

A separate paragraph is necessary for the Ladies' Section of the Louvain Group. They are full of enthusiasm, preparing papers and reports as required by their zealous secretary, and arranging musical programmes and recitations for the social gathering which follows the educational course with a devotion and willing obedience which is simply amazing. These are the mothers of the future Esperantists, and if their example could only be followed in England, "Esperanto, the second language for all," would soon be no longer a watchword, but an accomplished fact.

Altogether, the visit proved too short, encouraging and hopeful as it undoubtedly was. Most of the Esperantists were young, guided and controlled by the elders, and manifesting a force that sooner or later is bound to produce a telling effect.

#### *The "Spectator" on Esperanto.*

The extent to which Esperanto is making way in Great Britain is often but imperfectly realised even by Esperantists. But every month affords fresh evidence of the steady progress which Esperanto is making among the more thoughtful and influential classes. The *Spectator* of Aug. 13th contained a long article on "The Want of an International Language," the significance of which it would be difficult to over-estimate. For the *Spectator*, as Mr. H. W. Nevinson remarks in the current number of the *North American Review*, represents "the British spirit at the very best." "It is," he continues, "a newspaper which is the

source of true culture to the thoughtful middle classes, and is by them justly regarded as moderate and reasonable in its judgment. It is the highest literary authority in the English newspaper world, and it has declared itself emphatically in favour of Esperanto."

Taking as its text the discussion of the subject of an International language at the meeting of the French Association for the advancement of Science at Grenoble, the *Spectator* examines and dismisses as impracticable the various national alternative languages such as Latin, English, French, and Spanish. It then pronounces judgment in favour of an artificial language, and Esperanto especially, in the following terms:—

"By far the most promising is Esperanto. It is remarkably easy to learn, owing to its irreducible minimum of grammar and its extreme simplicity of vocabulary. As far as we have examined it, we see no reason why this really simple and scientific language should not afford to the tourist and the merchant exactly what they need for communication with foreigners. If Esperanto proves equal to its claims, and is universally adopted as the second language to be taught in the schools of the world, a great stumbling block to free communication between alien races will be removed."

#### *Group Reports.*

There are not many such at this time of the year. Dover, the most active just now, is fully reported elsewhere. Very sad news comes from Newcastle. Professor Gurney, the President, lost his life whilst mountaineering at Arolla. His loss will be all the more deeply deplored because in Great Britain so few university men of high standing have hitherto evinced so quick a perception of the advantages of Esperanto as has been shown by the heads of the French universities and the professors. In Brighton the gatherings are most successful; until a suitable location has been found Mr. Lambert receives the Esperantists at 8 o'clock on Saturdays at 59, St. Aubyns, Hove, and their full intention is to increase their membership largely and speedily.

The Plymouth Circle meets at the Ruskin Institute. Last season the classes were held only once a fortnight; the arrangements for the autumn are not yet complete.

The Forest Gate Group meetings will re-open on September 15th at the house of the President, Dr. V. G. Batteson, 39, Woodgrange Road.

A Photographic-Esperantist Group has also been founded in London. Information can be received from the Secretary, S<sup>ro</sup> S. Maitland, 22, Maclise Road, West Kensington. The next meeting will be on September 8th.

## CORRESPONDENCE NOTES.

The Editor much regrets that, owing to the numerous Esperantic week-ends, and the work connected with his relinquishing the hon. secretaryship of the London Esperanto Club, he has not been able to give the usual attention to his post-bag. He therefore trusts that those who have not received prompt replies will excuse the delay.

Next month he will leave town about September 15th, and no letters can be forwarded for a week or so. The October number should, however, be ready as usual.

In case any old subscribers should have failed to notice the announcement on last issue's cover *re* the increase in price of back numbers, the time limit is extended till September 10th. All wishing to complete their series should send before that date, as the price of Nos. 2 to 8 (inclusive) will thereafter be raised to sixpence a copy.

Those willing to dispose of No. 1 will greatly oblige by informing the Editor of the lowest price they will accept for the same.

The use of the apostrophe in Esperanto prose is not to be encouraged, and has never appeared in this Gazette. It is only permissible under the following conditions:—The A of the definite article may be omitted when it follows a preposition ending in E. *La domo de l' mastro* is thus met with occasionally. But this elision is not permissible in any other instance, even when the substantive following the article begins with a vowel. Thus *La amikoj*, and never *L' amikoj*. But the question of elision is better left alone.

Among the useful little suffixes which do so much to simplify our vocabulary, perhaps the most troublesome to the beginner are IG and IĜ. Our good friend, the Rev. R. A. Davis, has favoured us with another of his invaluable aids to memory in this connection. "We kill, or *cause to be killed*, pIGs, in order that they may *become sausiĜes*." Who can now confuse them!

The Penny Text-Book is now on the market, and has probably been seen by many of our readers, for the publishers are sparing no efforts to bring this useful and somewhat humorous booklet into notice. Such a sentence as: *La leonoj estis tiklataj de la lunatiko* is bound to produce such an effect on the student's brain that the agreement of participles can no longer be a source of doubt.

Another step in the right direction is the publication of the *Note Book*, a new monthly paper containing articles and lessons in Esperanto. Esperantists should send for a specimen copy (price 2d.) from the Editor. Annual sub., 2s. 6d., also received.

All Club Members are invited to the Monday meetings at the Club Café, 5, Bishopsgate Street Within, from 5.30 to 7; also from 7 to 9 at 100, Gracechurch Street (by the courtesy of the Remington Typewriter firm). These meetings have been especially interesting and instructive of late, as several foreign Esperantists have been present.

We advise those of our readers who are desirous of setting about founding Esperanto groups to carefully read page 52 (No. 4) of THE ESPERANTIST. The excellent articles appearing from time to time in the Press also contain valuable information and hints. The chief examples not hitherto referred to are:—*Ethics*, page 244 (July), by H. J. Bridges; *The Ilford Guardian* (August 5th), by John Kent; *The Herts Advertiser and St. Albans Times* (August 13th), by J. Catton; *The Daily Express* (August 17th), by Miss Lawrence; *The Star* (August 18th), by a humorous critic, and *The St. James' Gazette* (August 15th).

The ever-increasing number of the clergy taking up Esperanto calls forth the suggestion: Why not have a sermon on the humanitarian nature of our movement?

One often hears of Peace sermons; but surely the adoption of Esperanto will do more to spread the Peace movement than can no end of propaganda on former lines.

Some correspondents are always interested in knowing some of the items to be looked forward to next month. The twelfth issue should contain a new hymn by Ben Elmy, with charming music by J. Hadfield. A treatise on the effect of physical culture on mental power by J. F. H. Woodward; another Indian tale by Alfred T. Simper; and a humorous skit, entitled *La Liber-tempulo*, from the pen of H. W. Southcombe (a new contributor), will, when added to the poetry page, help to provide, it is hoped, a number of considerable interest. Club news, from two to four pages, will appear regularly, so long as THE ESPERANTIST is recognised as the only official organ of the Association.

## VIRINO TUTE NEINTERESA.

Kvara Vera Rakonto. Originale verkita de E.W.

Ŝi ne estis ĉiam sensignifa ; ŝi kaj ŝia fratino estis estintaj dum du aŭ tri jaroj la belulinoj je du graf-landoj, eĉ je la urbo Bath. Sed ŝia fratino edziniĝis, la patro mortis, kaj ŝi translokiĝis kun ŝia malsana, tre malfeliĉa, patrino, en dometon apud vilaĝeto.

Ŝia fianĉo ne estis aprobita de ŝiaj parencoj ; ŝi nur povis vidi lin malofte.

Lia idealo je perfekta virino estis tiu, kiu malmulte legas, malpli parolas, kaj kiu neniam rezonas, sed senĉese moviĝas la kudrilon.

Tial dum preskaŭ ok jaroj ŝi sidis, horo post horo, faranta belegajn brodojn kaj pasamentojn, neniam elirante ekster la ĝardeneto, krom por ĉiutaga vizito al sia onklino, kiu loĝis en proksima mega dometo, por servi okaze ian malsanan aŭ malgajan najbarinon, aŭ por iri en la preĝejon unufoje la Dimanĉon.

Ŝi do sin sentis senutila.

Ŝiaj patrino kaj onklino ambaŭ havis servistinojn amindan kaj fidelan, kies societo sufiĉis je ŝiaj mastrinoj, kiuj multe ŝatis librojn.

Fine ŝia onklino mortis, kaj ŝi heredis grandan riĉecon. Ŝia fianĉo ĝis tiam estis estinta malferora amanto, sed nun li fariĝis urĝa, kaj ŝia patrino, antaŭvidante proksiman morton, ne volis ŝin lasi solan, kaj do konsentis rapidigi la edziniĝon.

Ŝia nova hejmo estis en la plej proksima urbo, kie ŝi havis baldaŭ multe da konatuloj, kiuj diris : "Tiu ĉi novedzino estas gracia kaj bela, sed ŝi estas terurige neinteresa."

Fariĝinte patrino, ŝi ŝajnis fariĝi pli juna, gaja kaj tute feliĉa. La bela infaneto estis bonvena trezoro por la geedzoj.

Tre granda nombro da parencoj kaj amikoj kunvenis por festi la bapton feston. Ili estis atendantaj en la ĝardeno, je la horo de la ceremonio, por iri al la preĝejo, kiam ili aŭdis laŭtajn kriegojn. Poste oni aŭdis la vortojn : "Mi estas tute ruinigita, neniŭ min dungos post tio ĉi."

La malfeliĉa nutristino, rapide sin turninte por atingi la baptovelon, rompigis la kolon de la infaneto !

Tiu ĉi historio estas rakontita al mi de unu el la gastoj, kiuj kuregis en la ĉamburon.

Tie oni vidis la patrinojn, tiel pala kiel ŝia mortigita ido, kiu estis tenata en ŝiaj brakoj.

Ŝajne ŝi duonsveniĝis kaj dum longaj horoj nek parolis nek ploris. Tamen, antaŭ ol cedi je ŝia malespero, ŝi estis komfortinta la ploregantan servistinojn per la promeso : "Neniam mi eksigos vin antaŭ ol vi zorgu nutradis unu el miaj idoj dum du jaroj !"

Aŭdinte de la nutristino tiun promeson, la

kunvenintaj amikoj miregis. La kompatinda patrino estis nevino de *Nia Fraŭlino*, tial ili kredis ke ŝi estis kuraĝa kaj justa, sed tian rimarkindan bonecon ili tute ne atendis. Kelke da ili eĉ kredis, ke la promeso nur estis elpenso de la ruza servistino.

Ĉu donita aŭ ne, la promeso plenumiĝis.

Dum kelkaj jaroj la patrino restis pala, magra, malĝoja kaj ekscitema. La kuracistoj diris, ke ŝi neniam plifortigus, vidante ĉiutage la virinon, kiu mortigis ŝian infaneton, kaj amikoj petegis ke ŝi eksigu la virinon el la domo. Sed ŝi respondis : "Eble Dio volas mian morton. Li ja ne povas deziri, ke mi ne plenumu promeson mian. En mia familio, promeso estas ĉiam sankta !"

Fine alvenis tempon, kiam ŝi havis duan infaneton, palan, delikatan knabon (kiu hodiaŭ estas forta avo), kaj ŝia ekscitemeco kaj maltrankvileco pligrandigis. Sed fine la longe atendita tago alvenis, la dujara naskotago de la etulo.

Je tiu ĉi okazo, ŝi venis frumatene al la nutristino kun la promesita atesto pri kapableco kaj sciigis al tiu ĉi, ke ili disigu tuj kiam alia nutristina servo troviĝos por ŝi.

De tiam, la sano de la patrino pliboniĝis, ŝia ĝajeco revenis, kaj denove ŝi fariĝis tute kontenta. Kvar jaroj poste, ŝia edzo konstruigis belan domon du mejlojn de la urbo. Tie ŝi estis tre feliĉa kun ŝiaj ĝeinfanoj. Pro bona kaj simpla gastameco ŝi fariĝis bone amata en la graflando.

Sed ve ! tiu feliĉeco ne estis longedaŭra. Post tri jaroj ŝia edzo estis paralizita, kaj fariĝis tre postulanta malsanulo. Tiam ŝi hazarde konstatis, ke li procentdonis tutan lian riĉecon, kaj la ŝian, en jarpago je lia propra vivo sole. Ŝi ne volis malkontentigi lin, kaj ne informis lin pri ŝia eltrovo. Tamen ŝi ne povis multe ŝpari. La edzo eĉ rifuzis vendi sian veturilon kaj ĉevalojn, kaj eksigi la du servistinojn, kvankam li neniam povis ilin uzi, kaj ŝi neniam eliris el la domo.

Kiam ŝi vidviniĝis, la aferoj estis aranĝitaj, kaj restis nur sufiĉe da bieno por doni £51 jara enspezo. Ŝi do translokiĝis en loĝejon, kaj, kun la helpo de servistino kiu ne konsentis sin forlasi, kaj ne eĉ ricevis salajron, ŝi subtenis la ĝeinfanojn. Ŝiaj parencoj ne eĉ sciigis pri ŝia malriĉeco, sed la boparencoj ĝin sciis, kaj pagis la edukkostojn de ŝiaj filoj, kaj, post iom da tempo, la morto de boonklo denove riĉigis ilin sufiĉe.

La cetero de ŝia vivo estis tre feliĉa. Adorata de ŝiaj ĝefiloj, amata de ŝiaj servistinoj, kaj respektigata de ĝeamikoj kiuj rakontis multajn ekzemplerojn de ŝia kuraĝeco kaj bonkoreco, ŝi atingis grandan aĝon.

## DOVERO.

H. Bolingbroke Mudie.

Fine la tago por la unua Angla kunveno de Britaj kaj Alilandaj Esperantistoj estis preskaŭ alveninta. Mi trovis min en vagonaro, kune kun du fervoraj kunbatalantoj, veturante Doveren. La aliaj Londonanoj nur alvenis en Dovero du tagoj poste.

Ni ne estis la solaj personoj tie allogitaj. Diversaj kaŭzoj klarigis la troplenigon de nia vagonaro. La belega somera vetero kaj la Aŭgusta monato estas ĉiam sufiĉaj por allogi multe da personoj al tiu historika urbo, sed je tiu ĉi okazo ili tien iris por vidi la aŭtomobilajn boatojn, kiuj estis farontaj konkurso de Kalezo ĝis Dovero.

Sinjoroj Finez kaj Geddes, la ĉefaj klopodantoj de la Dovera Grupo, afable kondukis nin ĉi kaj tien. Ili sciigis nin, ke la ŝipego de la Red Star Line vizitus la Doveran Havenon por la unua fojo tiun vesperon. Kaj efektive, iom poste, ni ekvidis tiun grandegan marirantan ŝipegon alproksimantan.

Dovero estas la lasta haltejo antaŭ New York; kaj mi devas konfesi, ke mi ne malmulte enviis la feliĉulojn, kiuj estis farontaj vojaĝon sur tia trankvila maro.

La Kapitano afable montrigis al ni la ŝipegon, kaj invitis nin vespermanĝi en la mangosalono de tiu ĉi Ruĝa Stelo palaco. Sed estas la Verda Stelo kiu nun devas konsideriĝi.

Dum la nokto ekblovis venteto, kaj la matena maro estis punktata de blankaj ĉevaletoj—kiel ĉe ni oni nomas la ŝaŭmigantajn ondetojn. Tamen, la vaporsipo ne multe luliĝis, kaj ni alvenis ĝustatempe en la Kalezan Havenon kaj, dank' al Esperanto, denove marŝis sur Francan teron. Niaj tieaj geamikoj atendis nian alvenon, kaj la stelportantoj donis al ni koran akcepton sur la digo.

Ni intencis tuj iri por renkonti la Bulonjanojn; sed la atendita alveno de M. Camille Pelletan, Franca Mara Ministro, ŝanĝigis nian intencon kaj restigis nin kelkajn momentojn ĉe la stacidomo, admirantajn la multe da ora pasamento, kiun portis la diversaj kolektigintaj oficiroj. (Proksiman tagon Mmo. Pelletan fariĝis Membrino de la Kalaisa Grupo).

Forpromenante, ni konstatis, ke la stratoj estis ornamigitaj de miloj post miloj da flagoj, kiuj malfeliĉe ne tie troviĝis nur por festi la Esperantistan Kunvenon! Ankaŭ la maristoj havis sian festan tagon kaj sian karnivalon.

At last the day for the first English gathering of British and Foreign Esperantists had almost arrived. I found myself in a train, together with two devoted fellow-workers, going to Dover. The other Londoners only arrived in Dover two days later.

We were not the only persons attracted there. Various reasons accounted for the overcrowding of our train. The lovely summer weather and the month of August are always sufficient to attract many people to this historic town, but on this occasion they were also going there to see the automobile boats, which were about to race from Calais to Dover.

Messrs. Finez and Geddes, the principal workers of the Dover group, kindly took us here and there. They informed us that the Red Star Liner would visit Dover Harbour for the first time that evening. And, in fact, a little later we caught sight of that great ocean liner approaching.

Dover is the last stopping place before New York; and I must admit I envied not a little the happy folks about to sail on such a tranquil sea.

The Captain kindly had us conducted over the vessel, and invited us to supper in the dining saloon of this Red Star palace. But it is the Green Star which must now be considered.

During the night a breeze sprang up, and the morning sea was flecked with little white horses, as by us the breakers are called. Nevertheless, the steamer did not roll much, and we arrived punctually in Calais Harbour and, thanks to Esperanto, once more walked on to French soil. Our friends there had awaited our arrival, and the "starred-ones" gave us a hearty welcome on the quay.

We intended to go at once to meet the Boulogne members; but the expected arrival of M. Camille Pelletan, Minister of Marine, changed our plan and detained us a few minutes in the station admiring the mass of gold lace worn by the various officers assembled. (Next day Mme. Pelletan became a member of the Calais group).

On leaving, we found that the streets were decorated with thousands upon thousands of flags, which, unfortunately, were not there merely to celebrate the Esperantist Congress! The sailors also were having their feast day and their carnival.

Baldaŭ ni renkontis la Bulonjajn vizitantojn, kaj kunvenis ĉe la ĉefloko de la Grupo por oficiala prezentado. Tio farite, ni eniris la manĝoĉambro de la *Hôtel Sauvage*. Neniam mi estis manĝinta kun tiom da Samideanoj. Sepdek ni estis ĉirkaŭ la tablo. Ĉio estis tre bone aranĝita, kaj ni ĉiuj estis pli ol kontentaj pri la rezultato. Dum la manĝado la gaja karnivalo preterpasis la straton, aldonante alian interesajn al la memorinda tago.

Inter la kunvenintaj Esperantistoj ne nur estis membroj el Kalaiso kaj Bulonjo, sed multaj departementoj de la Esperantujo tie reprezentigis. Kapitano Capé (Algerujo), Profesoro Offret (Liono), Barono de Ménil (Reims), Komandanto Mathon (Clermont - Ferrand), M. Pourcines (Nancy), Leŭtenento Dupont (Valenciennes), M. Michaux (Boulogne), M. Wicart (Roubaix), M. Deligny (St. Omer), kaj M. Lefebvre (Elboeuf) estis kelkaj el la Francaj partoprenantoj; Sro Kuhl (Bohemujo) kaj Sro Seynaeve (Belgujo) ankaŭ tie estis. La Urbestro afable sendis du deputatojn por ĉeesti tiun internacian kunvenon.

Post la tagmanĝo, ni promenadis en la antikvan urbon, tiel interesan por ni Angloj, ĝis la kvina, je kiu horo komencis la koncerto ĉe la Ĉambrego St. Michel.

Doktoro Guyot, Prezidanto de la Kalaisa Grupo, denove diris afablajn pensojn, kaj Kapitano Capé elektigis Prezidanto.

Post la aŭdo de diversaj telegramoj el Esperantujo, ni aŭskultis tre interesajn paroladojn de multaj kunvenintoj.

La koncerto estis tute sukcesplena, kaj ni ĉiuj ŝuldas korajn dankojn al M. Michaux, ĝia sindonema aranĝinto.

Ĉirkaŭ la 7.30 ni malkuniĝis por vespermanĝi.

Poste, kelkaj promenadis laŭlonge la marbordo, aliaj eniris la Kasenajn Ĝardenojn, kaj ĉiuj estis tute kontentaj ĝis la forirtempo, kiam la Bulonjaj amikoj revenis en siajn hejmojn, kaj mi estis devigata reveni en Doveron por la vaporŝipo de la unua horo matene.

Ne plu blovis la vento, kaj la vetero promesis esti perfekta por la aŭto-boatoj, kiuj ne ankoraŭ povas toleri maltrankvilajn marojn.

La oka de Aŭgusto komencas! La elementoj aplaudas la Esperantistan feston!

Ĉio, kion oni povis imagi, estas estinta farita por sukcesigi la kunvenon.

La vizitantoj havis specialajn ŝipbiletojn, je pli malalta pago, kaj la biletovendisto permesis tiun rabaton nur al personoj portantaj la verdan steleton. Bonega ideo!

Ĝus antaŭ la alveno de la Esperantistoj la konkurso de la aŭtomobilaj boatoj finiĝis: Francujo estis gajninta la venkon. Niaj najbaroj do montris

We soon met the Boulogne visitors, and assembled together at the Group's headquarters for official presentation. This accomplished, we entered the dining room of the *Hôtel Sauvage*. Never had I lunched with so many friends-in-Esperanto. We were seventy round the table. Everything was capitally arranged, and we all were more than satisfied with the result. During the repast the gay carnival passed along the street, adding another point of interest to the memorable day.

Among the assembled Esperantists were not only members from Calais and Boulogne, but many departments of Esperantoland were represented there. Captain Capé (Algeria), Professor Offret (Lyon), Baron de Ménil (Reims), Commandant Mathon (Clermont-Ferrand), M. Pourcines (Nancy), Lieut. Dupont (Valenciennes), M. Michaux (Boulogne), M. Wicart (Roubaix), M. Deligny (St. Omer), and M. Lefebvre (Elboeuf) were some of the French participants; M. Kuhl (Bohemia) and M. Seynaeve (Belgium), were also there. The Mayor kindly sent two delegates to be present at this international gathering.

After lunch, we walked about the ancient town, so interesting to us Englishmen, till five o'clock at which hour the concert began in St. Michel Hall.

Dr. Guyot, President of the Calais Group, again gave utterance to some very kind thoughts, and Captain Capé was elected chairman.

After hearing several telegrams from Esperantoland, we listened to most interesting discourses from many of those assembled.

The concert was thoroughly successful, and we all owe hearty thanks to M. Michaux, its devoted organiser.

At about 7.30 we separated for dinner.

Afterwards, some strolled along the shore, others entered the Casino Gardens, and all were quite content till the parting hour, when the Boulogne members returned to their homes, while I had to return to Dover by the one o'clock boat.

No longer did the wind blow, and the weather promised to be perfect for the automobile boats, which cannot yet endure rough seas.

August 8th begins! The elements applaud the Esperantist fête.

Everything imaginable has been done to make the gathering successful.

The visitors had special tickets at a lower rate, and the booking-clerk allowed that rebate only to persons wearing the green star. A capital idea!

Just before the arrival of the Esperantists the auto-boat race ended. France had gained the victory. Our neighbours thus showed their

sian antaŭmecon je tiu ĉi afero tiel, kiel je Esperanto.

Sed kia vidaĵo! Etaj boatoj kuregantaj sur la trankvila maro, kelkafoje preskaŭ kaŝataj de la ŝaŭmkurteno, kiu estis suprenĵetita pro la rapidegeco tra la akvo. Eĉ la torpedo-detruantaj ŝipoj, kiuj akompanis ilin, malfacile ĝiskuris ilin.

Tiu ĉi konkurso kredeble prokrastigis la alvenon de niaj vizitantoj. Certe ili mankis unu horon en Anglujo, sed gajnis pli longan rostadon je la sunradioj.

Tamen, kiam la *Nord* alvenis, ni vidis ke la trankvileco de la maro, kaj la scivolemeco de tiuj kiuj neniam antaŭe estis vizitintaj nian insulon, allogis multe pli grandan aron ol ni atendis. Preskaŭ cent da ili, antaŭ ol elŝipiri, kunkantis "Dio Savu La Reĝon." Sed la troa fajfado de la vaporo perdis la efekton, kaj, pro tio, ni ĉiuj kantis ĝin denove antaŭ la Lord Warden Hotelo. Mi certigas al vi, karaj Legantoj, ke neniam el la preterpasantoj nun estas senavizaj pri la Esperanta movado!

La programo anoncis, ke ni havus specialan ŝipeton, por viziti la Havenajn konstruaĵojn; sed bedaŭrinde, pro la konkurso, tiu proponita plezuro ne povis aldoniĝi, kaj mi do devis doni mallongan vortan klarigon pri la grandegeco de la entrepreno, kiu iom poste ebligos Doveron fariĝi unu el niaj plej indaj havenoj. La nunaj vizitoj de la transatlantikaj ŝipegoj jam asekuris ĝian estontan potencon.

En kafeo ni kunkantis la Marseillaise, kore kaj ĥore.

Ni tiam suprenrampis la monteton ĝis la antikva kastelo. Granda proporcio de la vizitantoj neniam antaŭe eniris Anglujon, kaj tre ŝatis la naturan belecon de nia marbordo.

La vespermanĝo mangiĝis ĉe Restoracio Mangilli, sed, kompreneble, la neatendita nombro de la partoprenantoj multe malhelpis la aranĝojn. Speciala tramo portis nin al la Urbestrejo, kiu elmontris grandegan devizon—**BONVENON! ESPERANTISTOJ.**

Lia Moŝto la Urbestro, Sir William Crundall (kiu estas ano de la Grupo), afablege permesis, ke ni kunvenus ĉe la Council Chamber.

Je la eniro en tiun ĉi belegan historikan ĉambregon, ornamitan de belaj pentraĵoj kaj vitroj, mi ne povis malpermesi al mi pensi pri la estinteco. Ĉar, antaŭ nur kelkaj semajnoj, mi estis enirinta la saman Council Chamber por fari la paroladon kiu fondigis la Doveran Grupon. Kaj nun, en la sama konstruaĵo, mi vidis Esperantistojn kunvenintaj de kvar diversaj nacioj ĉiuj aŭskultantaj, kaj partoprenantoj je, Esperantista koncerto. *Tempora mutantur!*

Nia afero ŝuldas multe, multege, al Sinjoroj Finez kaj Geddes, kies energio efektivigis la

go-ahead qualities in this matter, as well as in Esperanto.

But what a sight! Tiny boats tearing over the smooth sea, at times almost hidden by the foam-curtain, which was thrown up by the tremendous pace through the water. Even the torpedo destroyers which accompanied them kept up with difficulty.

This race probably delayed our visitors' arrival. Certainly they missed an hour in England, but gained a longer roasting in the sun's rays.

Nevertheless, when the *Nord* arrived we observed that the sea's smoothness, and the curiosity of those who had never before visited our island, had attracted a much greater number than we had expected. Nearly a hundred of them, before disembarking, joined in singing "Dio Savu La Reĝon." But the excessive hissing of the steam caused the effect to be lost, and we therefore all sang it again before the Lord Warden Hotel! I assure you, dear Readers, that none of the passers-by are now ignorant of the Esperanto movement!

The programme stated that we were to have a special boat to visit the Harbour works; but unfortunately, on account of the race, that proposed pleasure could not be included, and I had therefore to give a short verbal explanation of the magnitude of the undertaking, which will in a short time enable Dover to become one of our finest harbours. The present visits of the transatlantic liners have already assured its future importance.

In a café we sang the Marseillaise, heartily and in chorus.

We then scrambled up the hill to the ancient castle. A large proportion of the visitors had never before been in England, and much appreciated the natural beauty of our coast.

Dinner was taken at Mangilli's, but, of course, the unexpected number of persons greatly hindered the arrangements. A special tram took us to the Town Hall, which displayed an enormous motto—**BONVENON! ESPERANTISTOJ.**

His Worship the Mayor, Sir William Crundall (who is a Member of the Group), had most kindly allowed us to assemble in the Council Chamber.

On entering this magnificent historical hall, ornamented with fine paintings and glass, I could not help thinking of the past. For, only a few weeks ago, I had entered the same Council Chamber to give the lecture which founded the Dover Group. And now, in the same building, I saw Esperantists assembled from four different countries listening to, and taking part in, an Esperantist concert. *Tempora mutantur!*

Our cause owes much, very much, to Messrs. Finez and Geddes, whose energy has brought about

feliĉan okazon. Sed ankaŭ ni devas sendi niajn sincerajn gratulojn al ĉiuj helpantoj.

Sir William Crundall mem ne povis ĉeesti, pro la festo por honori la aŭtomobilistojn. Sed S<sup>ro</sup> A. T. Walmisley, M. Inst. C.E. (unu el la Urbeŝtraro), kiu estas Prezidanto de la Grupo, anoncis afablan kaj kuraĝigantan sendaĵon de la Urbeŝtro, kiu sendis sian koregan bonvenon.

La unua kantaĵo ĉe la koncerto kompreneble estis "Dio Savu La Reĝon" (nun parkere lernita). Tiam S<sup>ro</sup> Geddes kantis la unuan strofon, kaj S<sup>ro</sup> Dervaux la lastan, de la Marseja Himno, ĉiuj kunkantantaj je la horo La tegmento tremetis je la fervoro de la kunkantantoj!

La karaj Bergier kaj Michaux infaninetoj, kiujn ni tiel bone memoris ĉe Bulonjo, estis kunvenintaj por recitisiajn ĉarmajn Lafontaineajn fablojn, starante sur la tablo.

La unua parto de la koncerto ja estis ĝuata; kaj, kiam ni aviziĝis ke la Urbeŝtro estis provizinta nutraĵon, ni eniris en apudan ĉambron kaj manĝis je lia sano glaciaĵe, kaj trinkis je ĝi ĉampane.

La Prezidanto ankaŭ devis ĉeesti la aŭtomobilistan feston, kaj mi elektigis je la prezidantan seĝegon.

La dua parto de la koncerto komencis per la nova melodia himno de S<sup>roj</sup> Hadfield & Ben Elmy. Ĝi enpresigis sur la venonta Gazeto ĉar multaj plendas pri la rareco de Esperanta muziko.

M<sup>o</sup> Michaux, la koncertestro, recitis tre larmoplenan kaj amuzigan skizeton, kaj D<sup>ro</sup> Guyot faris dankeman paroladon. Li diris: "Niaj amikoj estas tre feliĉaj respondi al la afabla invito de la Dovera Grupo. Jam en Kalezo ni ricevis multajn fremdajn amikojn, precipe tiujn de la transmario. Hierat kaj hodiaŭ la Esperantistoj preparis novan koran interkonsenton. Mi devas diri ke ili sukcesis. Ni dankas ne nur ĉiujn Samideanojn, sed precipe la Doveran Grupon."

S<sup>roj</sup> Kuhn kaj Seynaeve diris malmultajn vortojn por kuraĝigi la eklernantojn, kaj por pruvi ke lingvaj malfacilaĵoj nun ne devas ekzisti inter diversnaciaĵoj, dank' al nia mirinda lingvo.

Denove "Dio Savu La Reĝon"; denove "La Marseja Himno"!

Speciala tramo portis sesdek membrojn ĝis la enŝipejo, kaj la aliaj promenis tien.

Iom post la dekunua niaj alilandaj amikoj denove estis apartigitaj de ni per marstreketo. Sed dolĉaj estas sonoj sur la akvo, kaj la voĉoj de la ŝipaj kaj digaj horistoj unuigis je duobligita energio. Pri Doktoro Zamenhof ni kantis: "For he's a jolly good fellow." S<sup>ro</sup> Reeve rekantis

the happy event. But we also must send our sincere congratulations to all helpers.

Sir William Crundall himself could not be present, on account of the dinner in honour of the automobilists. But Mr. A. T. Walmisley, M. Inst. C.E. (one of the Council), who is President of the Group, announced a kind and encouraging message from the Mayor, who sent his most hearty welcome.

The first item of the concert was, of course, "Dio Savu La Reĝon" (now learnt by heart). Then Mr. Geddes sang the first verse, and M. Dervaux the last, of the Marseillaise, all joining in the chorus. The roof shook with the fervour of the choristers!

The dear little Bergier and Michaux children, whom we remembered so well in Boulogne, had come to recite their charming Lafontaine fables, standing on the table.

The first part of the concert was thoroughly enjoyed; and, when we were informed that the Mayor had provided refreshments, we entered an adjacent room and ate his health in ices, and drank it in champagne.

The President had also to be present at the automobilist feast, and I was elected to the presidential chair.

The second part began with the new melodious hymn by Messrs. Hadfield and Ben Elmy. It will be printed in the next Gazette because many complain of the scarcity of Esperantist music.

M<sup>o</sup> Michaux, the director of the concert, recited a tearful and amusing sketch, and Dr. Guyot made an appreciative speech. He said: "Our friends are very happy to respond to the kind invitation of the Dover Group. In Calais we have already received many foreign friends, especially those from across the sea. Yesterday and to-day Esperantists have planned a new and hearty mutual understanding. I must say they have succeeded. We thank not only all fellow-thinkers, but especially the Dover Group."

Messrs. Kuhn and Seynaeve said a few words to encourage beginners, and to demonstrate that linguistic difficulties need not now exist between divers nationalities, thanks to our wonderful language.

Again "Dio Savu La Reĝon"; again "La Marseja Himno"!

A special tram conveyed sixty members to the pier, and the others walked there.

Shortly after eleven o'clock our foreign friends were once more separated from us by a narrow strip of sea. But sounds are sweet upon the water, and the voices of the choristers on ship and shore united with redoubled energy. Of Dr. Zamenhof we sang: "For he's a jolly good fellow!"

“Kara Lu,” kaj, kompreneble, la du naciaj antemoj plenigis la havenon de inspirema muziko. Nur post noktomezo la dolĉaj malproksimantaj sonetoj perdiĝis inter la bruetoj de la faletantaj ondoj, kaj, konstatante ke la unua Brita Esperantista Internacia kunveno nun apartenas al la memorinda estinteco, ni antaŭvidas je multe da tiaj feliĉaj estontaj kunvenoj.

Mr. Reeve repeated “Kara Lu,” and, of course, the two national anthems filled the harbour with inspiring strains. Only after midnight were the sweet receding sounds lost in the murmur of the rippling waves, and, realising that the first British Esperantists’ International gathering now belongs to the memorable past, we look forward to many such happy meetings in the future.

### KION DIRAS BIRDIDETO ?

(Imitaĵo de Tennyson), de A. Motteau.

Kion diras birdideto  
En la nesto, ĉe l’ tagiĝo ?  
—Kiel flugas patrineto,  
Flugos mi tuj en vekigi.

—Eta birdid’, neste restu,  
Ke pli fortflugila estu :  
Tiam, kun mi, en vekigi,  
Flugos vi ĉe la tagiĝo.

Ĉar obeos birdideto,  
Baldaŭ, kiel patrineto,  
Fortflugila ĝi vekigos  
Kaj de l’ nesto elflugigos.

Kion diras l’ infaneto  
En la lulil’, ĉe l’ tagiĝo ?  
Diras ĝi, kun la birdeto,  
—Kuros mi tuj en vekigi.

—Infaneto, pace restu,  
Por ke pli fortkrura estu :  
Kune, tiam, en vekigi,  
Kuros ni ĉe la tagiĝo.

Ĉar obeos l’ infaneto,  
Baldaŭ, kun la patrineto,  
Ĝi, pli forta, krure iros  
Kien ajn ĝi ja deziros.

### LA ROZO KAJ LA LEKANTETO.

Originale verkita de Clarence Bicknell.

Belega rozo kreskis en florejo ;  
Ne malproksime ankaŭ lekanteto ;  
La roz’ rigardis ĝin sur la herbejo,  
Kaj diris : “ Kion faras vi, floreto ? ”

“ Malgranda estas vi, kaj senodora ;  
Neniu vin admiras aŭ bezonas ;  
Vi senkultura vivas, senkolora ;  
Ĉu vi al mondo ian benon donas ? ”

“ Li papili’ flugante en ĉielon  
Sur via floro ne tre dolĉe tremas ;  
L’ Abel’ de vi ne serĉas la mielon ;  
Nur la piedoj homaj sur vi premas. ”

“ Malsupre tie vi ne povas aŭdi  
La melodimuzikon de l’ aero,  
Nek la belajojn de la mondo laŭdi ;  
Kion vi faras do, ĉe l’ nigra tero ? ”

Respondis al la roz’ la lekanteto,  
“ Ne pensas mi pri gloro kaj beleco,  
Sed sur la pint’ de ĉia ajn tronketo  
Cent semojn faras mi por l’ estonteco. ”

“ Sen ia dorn’ pikanta ĉe l’ folioj,  
Mi staras al ĉielo rigardante,  
Kaj brilas per la miaj lumradioj  
La tero, kiu nutris min, amante. ”

“ Mi vidas eĉ dezertojn ĉe l’ kamparo,  
Kaj ili ne beligos sen laboroj ;  
Mi do ekfloras dum la tuta jaro,  
Por kovri ilin per malgrandaj floroj. ”

La rozon iu vidas kaj deŝiras ;  
La lekantet’ malĝoja, sola restas ;  
“ Ha, ” diras ĝi, “ Pri glori mi ne sopiras  
Sed vivo kun laboro benoj estas. ”



# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

EDITED BY H. HOLMESHOKE MURIEL, 67, Kensington Gardens Square, W.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Wholesale Agents: 14, Norfolk Street, Strand, London, W.C.

## CONTENTS.

|   | Page   |
|---|--------|
| EDITOR'S NOTE                                     | 177-8  |
| PHYSICAL CULTURE (J. F. H. Woodward)              | 179-80 |
| THE XIX. CENTURY AND INTERNATIONALITY (A. Kohnan) | 180-81 |
| ESPERANTO-BOLSHIA (H. J. Lloyd, D. Litt. M. A.)   | 182-84 |
| CHILD'S WAKING PRAYER (translated by A. Moulton)  | 184    |
| THE CHILDREN (Charles Dickson)                    | 184    |
| CLUB NEWS   | 185-87 |
| THE HOLIDAY MAN (H. W. Smithcombe)                | 188    |
| CITIZEN, THE WOLF CHILD (by Alfred T. Simpson)    | 189    |
| A CONSEQUENCE AND ITS REMEDY (by E. W.)           | 190    |
| CONTENTS OF THIS PAGE                             | 191    |
| TELEPHONE (words by Ben Elmy, made by J. Dickson) | 192    |

For local information apply to the Man. Secs. of the following Official Societies:-

|                                 |  |
|---------------------------------|--|
| BATTERSEA—Mrs. A. T. Lee        | 11, Great Road, Battersea.   |
| BROOKLYN—Miss Dyerwood          | 10, Upper Westchester Villa, Park St., Upper Westchester Villa, Park St. |
| BUNTON—Mrs. C. W. Bacon         | 11, Kilmuir Road, Stroud.  |
| DUNDEE-ON-TYNE—Mrs. LONDON      | 11, Valley Terrace.  |
| DOVER—Mrs. H. E. GREENE         | 11, Southdown Road, Dover.   |
| EDINBURGH—Miss TRAVIS, M. A.    | 11, Green Street.  |
| FURNET BATH—Mrs. E. J. R. BELL  | 11, (Opposite) Hotel, St. James.   |
| GLASGOW—Mrs. J. H. WALLACE      | 11, Hepburn Terrace, Mount Florida.                                      |
| HIDDERSFIELD—Mrs. G. H. TAPLIN  | 11, Victoria Road, Herts.  |
| LEAMING—Mrs. W. A. JEFFERY      | 11, Park Road, Herts.  |
| KNOX—Mrs. J. ELLIOTT            | 11, Green Street, Herts.   |
| LEWIS—Mrs. J. E. WYMAN          | 11, Market Street, Lewes.  |
| LIVERPOOL—Mrs. B. E. LEWIS      | 11, Market Street, Edge Lane.  |
| LONDON—Miss LAWRENCE            | 11, Green Terrace, W.C.  |
| NEWCASTLE—Mrs. H. W. CAMPBELL   | 11, Market Street, Newcastle.  |
| PORESMOUTH—Mrs. GREENWOOD       | 11, Green Street.  |
| PLYMOUTH—Mrs. TULL              | 11, Green Street, Plymouth.  |
| ST. ANDREWS—Mrs. J. T. HARRISON | 11, Green Street, St. Andrews.   |
| TYNSMOUTH—Mrs. ALAN F. HARRISON | 11, Green Street, Tynemouth.   |
| WEST LONDON—Mrs. S. MARRIOTT    | 11, Green Street, West London.   |

En tia afero oni ne devas forgesi, ke estus estinta tute neeble ke individuo eldonu eĉ gazeteton en ia nacia lingvo post nur kelkaj monatoj da libertempa lernado. Tio ĉi nur estas ebla per nia facila Esperanto.

Estas malfacila afero, tiu ĉi redaktado de Esperanta gazeto!

Ĉiu vorto sendota al la presistoj (Ho ve! ne ankoraŭ Esperantistoj) devas esti skribmaŝinata, kaj, eĉ post tio, la korektado de prespruvoj postulas multe da penado. Preskaŭ ĉiam gravaj eraroj preterpasas la aŭtoran atenton, kaj ofte la viglecon ankaŭ de la Redaktoro.

Mi fidus ke, estonte, ĉiuj eraroj malaperos. Sed, denove, mi petas ke miaj legantoj senkulpigu ilin, se ili ĉeestos.

Mi nun povas prezenti al la mondo praktikan pruvon de la viveco, facileco kaj disvastiĝo de la Internacia Lingvo. En ĉiuj partoj de la mondo LA ESPERANTA GAZETO havas Abonantojn, tute sen komuna lingvo krom Esperanto.

Niaj kleraj verkantoj povas, per ĝi, sendi siajn belajn, originalajn aŭ tradukitajn pensojn en ĉiujn landojn. La Anoncantoj povas fidi je la Internacia Lingvo por gajni tutmondan vendejon por siaj komercaĵoj. Ĉiuj povas interkonatiĝi.

Hodiaŭ mi estas tre, sed ne tute, kontenta. Pro la akcepto de LA ESPERANTA GAZETO unu el miaj ambicioj plenumiĝis. Mi nun diros al Vi alian!

Inter la bela literaturo jam posedata de Esperantistoj vane mi serĉis *unu sufiĉe vidindan volumon!* Libroj nur legindaj estas ja bonegaj; sed ĉu ili sufiĉas?

Supozu, ekzemple, ke oni aĉetas la necesegan *Fundamentan Krestomation*. Ĝia kosto, laŭ Angla mezuro, ne estas tro granda; kaj oni estas kontenta posedi la 460 interesplenajn paĝojn. Sed ĉu la kosto ĉiam tie finiĝas? Oni trovas ke, kiel Anglo, oni ne plene ŝatas legi libron sub papera kovrilo. Oni do devas elspezi monon por ĝin bindigi. Tio pligrandigas ĝian koston de kelkaj frankoj. Nu, post kelkaj jaroj, kiam la libro fariĝis valora memoraĵo de la unuaj tagoj de la lingvo, ĉu oni estos kontenta ekvidi, ke ĝia papero flaviĝis; makuliĝis?

La respondon mi lasas al la Esperantistaro.

Estas necese ke kelke da prezentindaj libroj, bonepresitaj sur bona papero, sub bela kovrilo, ekzistu. Pro tiu celo mi intencas eldoni diversajn utilajn verkojn. Estas ankoraŭ tro frue atendi, ke la vendo povos pagi iliajn proprajn elspezojn; sed ilia eldoniĝo helpas la Aferon.

In this connection one must not forget that it would have been quite impossible for an individual to issue even a small gazette in any national language after only a few months of spare-time study. This is alone possible with our easy Esperanto.

It is a difficult business, this editing of an Esperanto gazette!

Every word sent to the printers (alas! not yet Esperantists) has to be typewritten, and, even after that, proof correcting demands much care. Almost invariably serious errors escape the author's attention, and often the vigilance of the Editor also.

I trust that, in the future, all errors will disappear. But, once again, I beg my readers to excuse them, should they be present.

I now am able to present to the world a practical proof of the vitality, facility and spread of the International Language. In all parts of the world THE ESPERANTIST has subscribers entirely without any common language other than Esperanto.

Our clever writers can, by its means, send their beautiful, original or translated thoughts into every country. Advertisers can rely on the International Language to gain a universal market for their goods. All can become acquainted one with the other.

To-day I am very, but not altogether, content. On account of the reception of THE ESPERANTIST one of my ambitions is fulfilled. I will now tell you of another!

Among the fine literature already possessed by Esperantists in vain have I sought *one volume of sufficiently attractive appearance*. Books merely readable are, indeed, excellent; but do they suffice?

Suppose, for example, that one buys the indispensable *Fundamental Chrestomathy*. Its cost, according to English standard, is not too high; and one is pleased to possess the 460 interesting pages. But does the cost always end there? One finds that, as an Englishman, one cannot fully enjoy reading a paperback. One must therefore spend money on having it bound. That increases its cost by some shillings. Then, some years later, when the book has become a valuable reminder of the language's early days, will one be pleased to discover that its paper has turned yellow; has become foxed.

The answer I leave to the Esperantists.

It is necessary that some presentable books, well printed on good paper, and in a nice cover, should exist. On this account I intend to bring out several useful works. It is still too early to expect that the sale will cover their expenses; but their publication will help the Cause.

La unua de LA ESPERANTAJ JUVELOJ estos *La Ventego, de Shakespeare*, tradukita de nia plej klera Esperantisto, Sro Motteau. Unua eldono, ilustrita, orumita supraĵo kaj belete bindata per malmola verda ledo [donacinda]. Kosto 2f. 60c., afrankite.

Finante, mi fidas ke Vi, kiuj ŝatas la *Verdkovrilajeton* afable surskribos sur la enmetitajn abon-paperojn, kaj sendos ilin al mi, sub la enmetita kovrilo, antaŭ la fino de Oktobro. Kaj se Vi skribos aliflanke proponojn por plibonigi la Gazeton mi estos kontenta.

Mi esperas, kune kun Vi, ke post 1904 LA ESPERANTA GAZETO enhavos dudek paĝojn anstataŭ ol dek ses; sed tiu afero dependas de la nombro da Abonantoj.

The first of THE ESPERANTO GEMS will be *Shakespeare's "Tempest,"* translated by our most able Esperantist, Mr. Motteau. First edition, illustrated, gilt top, prettily bound in soft green leather [suitable for presentation]. Price 2s. 1d., post free.

In conclusion, I trust that you who appreciate the *green-covered one* will kindly fill up the enclosed renewal application forms, and send them to me, in the enclosed envelope, before the end of October. And if you will write proposals on the back for improving the Gazette I shall be pleased.

I hope, with you, that after 1904 THE ESPERANTIST will contain twenty pages instead of sixteen; but that matter depends on the number of Subscribers.

VIA REDAKTORO.

YOUR EDITOR.

## ĈU FIZIKA KULTURO PLIGRANDIGAS SPIRITAN FORTON?

La Unua Premia artikolo en "Health and Strength Gazeto," de 1903.

Tradukita en Esperanto de la Aŭtoro, J. F. H. Woodward.

La respondo al tiu ĉi demando povas esti tre vera, tamen tre mallonga. *Jes!* Sed tiu respondo nek interesus nek kontentigus viajn Legantojn, tial ni esploros tiun ĉi aferon.

Ili do povas juĝi por si mem, ĉu ĝi ne estos je ilia profito partopreni en ekzercoj, kiuj ne nur plibonigas la sanon de la korpo, sed ankaŭ la povojn de la spirito.

Macfadden demandas: "*Kial la homo ne plibonigis fizike, kiel li faris en aliaj rilatoj?*"

Li respondas tiun ĉi demandon jene: "*Ĉar li dependis de medicina scienco por sia fizika bonstato.*"

Tiu ĉi estas sendube vera pri la estinteco, sed ne pri la nuntempo, escepte pri tio, ke ni ne enhavu tiun grandan klason da personoj, kiuj povas kalkuli ĝi laŭ miloj en la mondo, kiuj, kiam malsanaj, konfidas tute je ĉarlatanaj kuraciloj por sia resanigo.

Ni konas ke unu rezultato de tia malspriteco estas, ke grandaj nombroj da ili mortas multe da jaroj pli frue ol ili devus, se ili ne prenis tiujn ĉi ĉarlatanajn kuracilojn, kaj, anstataŭ ol tio alprenis "fizikan kulturon" kaj permesis al Naturo ordigi tion en la sistemo, kion ili sin mem malrektigis.

Se la malboneco tie ĉi finiĝis, ĝi estus sufiĉe malbona, sed malfeliĉe, ili naskigas en la mondan rason da malfortaj, malgrandaj estaĵoj, kiu mankas ĉian econ kiu igas grandajn kaj belajn virojn kaj virinojn, tiajn, kiaj estis la Spartanoj antikve. Ili nek havas fortecon nek grandecon de korpo, kaj estas pli malpli de malforta spirita povo. Tiuj ĉi kaŭzoj produktas moralan modelon de malalta grado. Ja ne estas fizika forteco sufiĉa por nutri

malfortan cerbopovon; tia estas la opinio de multe da kuracistoj ĉe la rifuĝejoj de lunatikoj en Anglujo kaj alilande.

Nu, kio estas la kaŭzo de tio ĉi?

Nur estas unu respondo: *La malatento je konvena flego kaj pligrandigo de la korpaj povoj, netaŭga nutraĵo, tabakfumo, la drinkaĵo, kaj malbonmoreco.*

Korektu tiujn ĉi aferojn, kaj, post du generacioj, estos nepra plibonigo ĉe la raso.

Tiu ĉi ŝanĝo jam estas iomete komencita, per la pluzado de gimnastikoj, kaj per kluboj de naĝarto, *pedpilk* kaj *kriketo*, inter la loĝantoj de urboj; kaj, se milita ekzerco estus farinta deviga en ĉia lernejo, la venanta generacio fariĝus pli supera je forteco kaj grandeco ol tiu de hodiaŭ; ĉar, kun brustoj plilarĝataj per plena spirado kaj aliaj atletaj ekzercadoj, kaj konvena fleksigo de la muskoloj de la ventro, mallakso kaj la ftiza mikrobo forpeliĝus.

Kun la korpo vivigata kaj la ĉirkaŭiro de la sango multege plibonigata, la povoj de la spirito kaj la memoro plibonigis laŭ la sama proporcio, kaj tio, kio nun estas spirita peno kaj cerblaciĝo, fariĝus plezuro. Tio ĉi estas la sperto de centoj da junuloj kaj maljunuloj kiuj faris la penon plibonigi sian sanecon kaj fortecon per "Fizika Kulturo," kaj kiuj sekvis la regulojn de Naturo kaj la konsilo de *Shakespeare*, kaj "*ĵetis drogojn al la hundoj.*"

Antaŭa Unua Premiulo ĉe Cambridge diris al la aŭtoro ke, dum du semajnoj antaŭ lia ekzameno, li neniam regardis libron, sed okupis sin de ekzerco sur ĉevalo, *raketoj*, kaj gimnastikoj. La rezultato estis ke, kun freŝa sana sango kuranta en la tuta

korpo, kiam li envenis la ĉambron de la ekzameno, lia cerbo estis kiel eble plej freŝa kaj klara kaj li povis respondi al ĉiuj demandoj facile kaj akurate. Tiel li gajnis la plej altan honoron de la jaro ĉe la Universitato. Li diris, ke tio ĉi ne estus okazinta, se li ne estis uzinta "Fizikan Kulturon," kiu forprenis ĉian nebulecon de la cerbo. Sekve la spirito estis tiel klara kiel la lumo.

Ni ne povus havi pli bonan ekzemplon ol tio ĉi, pri la valoro de korpa ekzercado por cerba verko.

Iuj el viaj legantoj nun bezonas scii, kiel gajni altan gradon da korpa sano, kaj spirita potenco.

*Nu, la reĝa vojo tien estas per dieto, ekzerco, banoj, kaj dormo.*

Ni konsideros ilin laŭvice, ĉar ĉiu el ili helpas la alian fari sian parton de la afero.

Mi ne nun aludas je preparado por ia speciala konkurso, sed je la ado de bona stato de ĝenerala sano, kio ebligas la korpon suferi grandan ekzercon sen sento de troa laceco, kaj kio konservas la cerbon en tre bona kondiĉo preta por serioza lernado, aŭ por la postuloj de vigla komerca vivado.

#### *Dieto.*

Sen nutra manĝaĵo, manĝata je konvenaj intertempoj, kaj ĝuste digestata, estas certe ke nenia vera progreso povos esti farata. Taŭga nutraĵo estas la fundamento, sur kiu la forteco de la korpo kaj la povo de la spirito konstruiĝas.

Estas provite per la esploradoj de D<sup>ro</sup> Alexander Haig kaj aliaj scienculoj kiuj faris specialan studon de la afero, ke la plej bona sano, kaj la plej grandaj povoj de persistado estas atingitaj per grenaj produktaĵoj, fruktoj kaj lakto, kaj ne de viando kaj de alkoholo.

Tio ĉi estas evidenta por la venkoj antaŭ ne longe gajnitaj de atletoj en Anglujo kaj en

Germanujo, kiuj nur nutradis sin per grenaj nutraĵoj, kontraŭ tiuj, kiuj alprenis viandan dieton.

Oni ne devas manĝi pli ol trifoje ĉiutage, kaj devas esti intertempo de kvar aŭ kvin horoj inter ĉiu manĝo. La plej malfrua ne devas esti post la sepa horo vespere. Ĉia mordaĵo devas manĝiĝi malrapide, kaj esti multe maĉata kaj trinkaĵo ne devas esti trinkata ĝis unu horo post la manĝo.

La Unuigitaj Ŝtatanoj estas fondintaj "Malrapidan Maĉon Societon."

#### *Ekzerco.*

Promenu almenaŭ du aŭ tri mejlojn ĉiutage en freŝa aero. Metu ekzercilon en via dormoĉambro, kaj sekvu la instruojn presitajn sur la karto, por dekkvin minutoj tuj kiam vi levigas, kaj por la sama tempo kiam vi estas kuŝigonta.

#### *Bano.*

Prenu varman banon kun sapo almenaŭ unu fojon ĉiusemajne por malfermigi la haŭttruetojn. Tio ĉi estas necesa por esti en perfekta sano; kaj ankaŭ bano sen sapo, varma aŭ malvarma, ĉiutage.

#### *Dormo.*

Ĉiam dormu sep horojn neinterrompita, se eble. Dormu kun la fenestro malfermita iom ĉe la supro, kaj larĝe malfermita dum la somero. La ekzerco varmigis vin antaŭ ol enliti, kaj la ekzerco kaj la freŝa aero dormigis vin bone. La stomako nur havanta iom, se ion, por digesti, ankaŭ ripozos (se oni ne manĝis post la sepa horo vespere) kaj morgaŭ funkcios multe pli bone.

Je konkludo, se la fraŭloj deziras esti ja viraj viroj, ili ne devas drinki, ili devas eviti ĉiujn malbonmorajn kutimojn, ili devas fumi kiel eble plej malmulte (pli bone estas neniam fumi), ĉar ĉiu el tiuj ĉi estas malamiko al forteco, kaj al konvena memkontrolo.

## LA XIX<sup>a</sup> JARCENTO KAJ INTERNACIECO.

### A. Kofman (Odessa).

Antaŭ kvar jaroj, kiam ĉiu ĵurnalo, gazeto, jarlibro kaj aliaj periodaj eldonaĵoj faris la karakteron de la XIX<sup>a</sup> jarcento, oni venis unuvoĉe al la konkludo, ke tiu epoko estis precipa periodo de internaciaj komunikoj; oni kalkulis la kilometrojn da telegrafaj kaj telefonaj fadenoj, la milionaron da kilogramoj de fervojaj reloj, la kolosalan spezon de internacia komerco, la neimageblan sumon de eksterlandaj leteroj, k.c., k.c. Por ankoraŭ pli substreki la kreskon de la internaciaj rilatoj de la XIX<sup>a</sup> jarcento oni citis ekzemplojn, ke la Angloj, Francoj, Germanoj kaj aliaj nacioj sendas interŝanĝe siajn infanojn por la someraj tagoj en diversajn landojn kun la celo lernigi al siaj idoj la fremdajn lingvojn. Interalie oni montris, ke la

turistaj kluboj vastiĝis sur la tuta tero, ellaborinte specialajn tarifojn por fervojoj, hoteloj, k.c., por siaj enlandaj kaj eksterlandaj membroj. Mallonge, legante tiujn ĉi sciigojn, oni efektive povus pensi, ke la nacioj faris grandegan progreson en la interkonatiĝo. Kio rilatas la fremdajn literaturojn, tiu ĉi punkto ŝajnis pli klara ol ĉio alia; de longe ja ĉiu biblioteko posedas la tradukojn de ĉiu pli aŭ malpli konata fremda aŭtoro.

Se tio ĉi diriĝis pri ĉiuj popoloj ĝenerale, kion oni devis diri pri la Angloj? La Angla nacio, kiu havas posedaĵojn en ĉiu parto de la mondo, kies ŝipoj vizitas ĉiun maron kaj golfon, kies turistoj estas precipe vojaĝemaj,—la Angla nacio devus unue koni la alilandan mondon, sed . . .

Cetere, estas preferinde paroligi S<sup>ro</sup>n Ĉukovski mem, kiu sufiĉe konas Anglujojn kaj la Anglojn.

Jen kion li skribas en la gazeto *Odesskia Novosti*, No. 6372, pri nia eminenta Rusa verkisto Anton Ĉehov, mortinta antaŭ nelonge:

“Mi vane atendis kelkajn tagojn, esperante trovi eĉ unu Anglan gazeton, kiu memorigus la nomon de nia ĵus mortinta verkisto. Sed ĝis hodiaŭ nenia gazeto aperigis eĉ unu linion pri li. Oni skribadis pri la *Malacca*, oni skribadis pri *Nju-Cvang*, sed la plej grandan pardonon, la plej doloran Rusan malĝojon oni eĉ ne rimarkis.

“Certe, la Anglaj gazetoj ne povas reflekti ĉiujn interesojn de la lando. Oni devas turniĝi al alia fonto. Mi prenas la lastan eldonaĵon de la *Brita Enciklopedio*. Mi trovas tie *Ĉefu*, *Ĉifu*,—la nomo de Ĉehov malestas! Fine en la artikolo pri la nuntempa Rusa literaturo (XXXII<sup>a</sup> volumo de la Enciklopedio, eld. 1902) mi trovas la serĉatan karan nomon. Por ne esti kulpigata je paskvilo, mi citas ĉion diritan tie:

“En la sfero de beletristiko, la plej eminenta estas A. Ĉehov, la ano de la nova partio. Kvankam li estas ankoraŭ juna, li jam montris sufiĉe grandan forton en siaj mallongaj noveloj. *Kelkaj noveloj de Gorki, de Ertel, de Jassinski ankaŭ montras konsiderindan kvaliton.*”

“Jen ĉio. Tio ĉi estas skribita en 1902, kiam jam ekzistis *La Mero, La Stepo, En la foso* de Ĉehov. Kaj la paralelo inter Ĉehov kaj Jassinski! Tia facilkora kaj fi-bonanima tintado de fremdaj nomoj pruvas superfluan fojon kiel neinteresa estas por la Angloj ĉio, kio ekscitas nin Rusojn, kio plenigas nian animon. Sendube la aŭtoro de tiu ĉi artikolo malestimas la temon de sia skribo, ĉar aliokaze li ne aldonus sian negliĝa-protektan epiteton ‘sufiĉe granda forto.’ Kia grandanimeco!”

“Ĉu tio ne estas stranga? La Angloj vojaĝas pli ol ĉiuj aliaj homoj, sed fremdajn landojn, la spiriton de fremdaj nacioj ili konas malplej! Edmund Gosse, la eminenta Angla kritikisto ne senkaŭze skribis en la *Heinemanna Internacia Biblioteko*: ‘Ni suriras la Alpoj, sed ni ne interesigas je la Svisaj pastoraloj; ni promenas laŭlonge kaj laŭlarĝe la fiordoj de Norvegujo, sed en nian kapon eĉ ne venas la ideo pri la grandaj mondkonceptoj, kreitaj de la verkistoj de tiu ĉi talentoplena popolo. Kun la Rusaj noveloj ni apenaŭ faris la komencon konon, kaj ni neniam demandis nin, ĉu ne ekzistas inter la Poloj Pola *Dostoovski*, kaj inter la Portugaloj Portugalaj *Tolstoj*.’”

“Kiel la Angloj konas Tolstojon mi jam parolis aliloke. Hodiaŭ, kiel specimenon, mi prezentas al vi perlon de la plej solida, plej serioza informilo *Webster's International Dictionary*.”

—“L. N. Tolstoj. Rusa novelisto kaj socialisto (?), naskiĝis en 1829 (?)”

“Tiel ne estas mirinde ke la nomo de Ĉehov tute ne estas en *Webster's Dictionary*.

“Ekzistas ankoraŭ unu fonto, reflektanta la Rusan spiritan vivon. Tio ĉi estas la ĵurnalo *Athenæum*, organo de la Angla kritiko, kie koncentriĝas ĉiuj aŭtoritatoj de la lando. Ĉiujare la Julia numero estas dediĉata al la revuo de la tutmonda literaturo, kaj la plej granda ĉarmo de tiu revuo estas ke pri Rusujo skribas Ruso, pri Holando—Holandano, k.t.p. En la antaŭa tempo estis profesoro P. N. Milukov, kiu skribis la revuon de la Rusa literaturo; li estis sekvita de K. Belmont kaj poste de V. Briusov. De tempo al tempo—ekzemple en 1901—la Angla ĵurnalo ŝajne opiniis ke la Rusa literaturo tute ĉesis ekzisti, kaj tial ĝi donis pri ĝi nenian raporton. Tamen, kiam la raporto estis, rilate Ĉehov oni silentis aŭ oni estis tre vortavara. Ĉiam oni okaze citis la nomon de Andre' Beli aŭ de D. Mereĵkovski pli ol de Ĉehov. Tial oni ne devas miri ke la Angla publiko tute ne konas la nomon de la eminenta Rusa verkisto. Estas yere ke tie ĉi aperis la traduko de *La Nigra Monaĥo* de Ĉehov, sed pri tiu ĉi traduko mi ne volas paroli nun, por ne blasfemi sur la freŝa tombo.

“Mi scias ankaŭ alian okazon. Mia kolego, Rusa korespondanto, perfekte posedanta la Anglan lingvon, tradukis la novelon de Ĉehov *La Ĉambro N. 6*, kaj prezentis ĝin al la atenta eldonisto Fisher Unwin. Tiu ĉi proponis al li reveni post 6 monatoj por povi informiĝi, ĉu Ĉehov estas sufiĉe konata al la Angla publiko. Mia kolego revenis post 2 jaroj kaj ricevis—rifuzon: la eldonisto ne volis riski presi la novelon, ĉar *la Angla publiko ne konas la aŭtoron de 'La Ĉambro N. 6.'*”

Tiu ĉi artikoleto de S<sup>ro</sup> Ĉukovski ne bezonas grandan komenton. La nombro de Rusoj, kiuj konas la Anglan lingvon estas tre malgranda, la nombro de la Angloj, kiuj posedas la Rusan, estas ankoraŭ pli malgranda. La XIX<sup>a</sup> jarcento, kiu faris “miraklajn” en la sfero de interkomunikigo de nacioj, ne atingis eĉ tian minimalan sukceson, ka la almenaŭa konatiĝo kun la eminenta Rusa verkisto, kiun nun ploras la tuta inteligenta Rusujo. Jen vi havas la XIX<sup>an</sup> jarcenton de internacieco! Tiu ĉi malĝoja kaj humiliga fenomeno estas superflua pruvo, ke la nescio de fremdaj lingvoj estas netransirebla baraĵo por la kono de fremdaj popoloj, de ilia spirito, de ilia literaturo, malgraŭ la telegrafoj, telefonoj, fervojaj reloj, k.c. *Sen internacia lingvo, sen Esperanto, la fremdaj popoloj restos por ĉiam tero nekonata.* Ni levu do alte la lumilon de Esperanto, kaj oni tuj vidos, aŭdos kaj sentos, ke la lingvo internacia estas efektive la plej potenca, kaj samtempe la sola rimedo por ligi la homojn en unu granda familio, almenaŭ samlingva.

## ESPERANTAJ SONOJ.

*Pri la plena malpermesobleco de ŝanĝoj de sonoj en Esperanto: verkita de R. J. Lloyd, D. Lit., M.A., Fonetika Instruisto ĉe la Universitato de Liverpool.*

Estante dum multaj jaroj studento de la sonoj de la homaj lingvoj, kaj de iliaj historiaj ŝanĝadoj, mi ekvidis, eble pli frue ol la granda plimulto da niaj kunverkantoj, danĝeron, kontraŭ kiu nia kara lingvo devos ĉiam, de tempo al tempo, fortege kontraŭbatali. Tio estas la danĝero de la dividigo de nia lingvo, per ŝanĝoj (diversaj en diversaj lokoj) de ĝiaj sonoj. La plimulto da niaj gefratoj tute ne rekonas tiun ĉi danĝeron; kaj ili estas iom inklinaj rideti, kiam la lingva studento parolas serioze pri ĝi. Ĉar ĝi estas danĝero, kiu enrampas en lingvon, grade, nesentible, sekrete, kaj kiu unue tiam sin klare montras, kiam ĝi estas fariginta nevenkebla. Ne ekzistas sola nacia lingvo en la mondo, kiu ne estas la frukto de la nekonsciaj sonaj ŝanĝadoj, kiuj diversigis, kaj fine disigis kaj dividis, kelkan pli fruan lingvon. La ĉefa kaŭzo de tio ĉi estas, ke estas preskaŭ neeble, elradiki tiujn ĉi ŝanĝojn de sonoj, post tiam kiam iu amaso da homoj akceptas ilin kaj praktikas ilin ĉiutage inter si. La diverseco, unufoje farita, restas ĉiam: kaj ĉiu nova diversaĵo proksimigas la tempon de disigo, t.e., la tempon kiam oni ĉesos sin reciproke kompreni.

Pli frue ol mi atendis, alvenas pruvo kaj ekzemplo de tiu ĉi danĝero: kaj li aperas ankaŭ en loko la plej neatendita, — en la bonega *Esperanta Sintakso*, de S<sup>ro</sup> Paŭlo Fruictier. Oni legas tie, §56:—

“En kelkaj vortoj, sed precipe en kunmetitaj, renkontiĝas konsonantoj, kiuj ne povas esti elparolataj unu post la alia. Tiam la unua estas vole nevole elparolata kiel la dua (t.e., mole aŭ malmole).”

La aŭtoro tiam konstatas la konsonantojn, inter kiuj tio ĉi okazas. Ili estas *b, d, g, ĝ, ĵ, v* aŭ *z*, antaŭirantaj aŭ sekvantaj *p, t, k, ĉ, ŝ, f* aŭ *s*; kio faras  $7 \times 7 \times 2 = 98$  duoj de konsonantoj, kiujn oni devos ĉiam elparoli, alie ol ili estas presitaj! Ekzemple, diras li, “*blovpafilo*” havas necese la sonon de “*blofpafilo*”; kaj “*ekzemplo*,” de “*egzemplo*”; kaj “*sed precipe*,” de “*set precipe*.”

Anglo, kiu elparolas ĉiun tagon, ne nur *vp*, kaj *kz*, kaj *dp*, sed preskaŭ la tutan aron da tiuj ĉi “maleblaj” duoj, simple miregas! Eble li diras al si trankvile “Ni diras ofte al ni en Anglujo *stovepipe, bedpost, arctic zone*; kie estas la malfacileco? Se oni povas elparoli *vp* kaj *dp* kaj *kz* tute facile en Angla, kial ne en Esperanto?” Kaj li rigardas sian “*Sintakson*” kun malespero, eble eĉ kun malfido!

Sume, la Anglo estas prava. Tiuj ĉi duoj (aŭ pli korekte, kelkaj el ili) estas nu rmaleblaj al niaj estimataj Francaj kolegoj, ĉar ili neniam uzas ilin en sia propra lingvo. Al la Anglo, aliflanke, ili ŝajnas iom pli facilaj ol ili reale estas, ĉar li uzas ilin ĉiutage.

Kaj tio, kion mi volas pruvi al niaj Francaj amikoj, per tiu ĉi artikoleto, estas ke ilia opinio pri la malebleco de tiuj ĉi koneonantaj duoj estas erara: kaj ke estus multe pli bone lerni kiel elparoli ilin, ol detrui unu el la plej brilaj meritoj de nia kara lingvo,—la absolutan neŝanĝeblecon de la elparolado de ĉiu vorto kaj de ĉiu litero en ĝia vortaro.

Skribante, mi ricevas informon, ke Anglaj amikoj volas ankaŭ ŝanĝi iom la sonojn. Mi parolos al ili pli malfrue, kiam ili estos presintaj siajn proponojn. Oni vidos baldaŭ ke tiu ĉi Franca propono estas tute sufiĉe por unu artikolo, por ĝin diskuti trae. Sed sciante, per la studado de la historio de lingvaj sonoj, kiel insida estas la danĝero de tiaj ŝanĝoj, mi estos ĉiam preta batali kontraŭ la plej malgranda ŝanĝo de la sonoj de nia lingvo.

Mi min trovas tute hejme en tiu ĉi temo pri konsonantaj duoj, ĉar mi skribas tiujn ĉi tagojn serion da artikoloj pri la intima strukturo de la 364 konsonantaj duoj, kiuj ekzistas en la Angla, por *Die Neueren Sprachen* de tiu ĉi jaro (1904–5).

Kaj ĉe la Franca flanko de la afero, mi estas studinta la lingvajn praktikadojn de la Francoj multe pli zorge kaj precize ol la plimulto de la Francoj mem, ĉar ĉe mi la sonoj de lingvoj estas profesia afero.

Eble kelkaj el niaj kunbatalantoj estas vidintaj la du ĉapitrojn, kiujn mi skribis en 1901 por la *English and French Word-Book*, de Sinj. Wm. Heinemann, el Londono. La unu estas Angle skribita, kaj priskribas la sonojn de la Franca lingvo por Angloj, kaj la alia estas France skribita, kaj priskribas la Anglajn sonojn por Francoj.

Mia punkto de vidado estas tial, nek tiu de Anglo, nek tiu de Franco, sed simple tiu de forta internacia Esperantisto. Ĉar mi tute ne povas kredi, ke Doktoro Zamenhof povus aprobi tiun ĉi regulon. Se “ekzemplo” havus por lia orelo, necese, la sonon de “egzemplo,” li estus certe skribinta “egzemplo,” de la unua komenco de la lingvo.

Kaj “ekzemplo” ne staras sole. Estas ankaŭ ekzameno, ekzekuto, ekzemplero, ekzercaro, ekzilo, ekzisti, k.t.a. Kaj preter *kz*, estas 97 aliaj duoj,

kiuj ĉiuj povas okazi en Esperantaj vortoj, kaj havi sian elparoladon malbonigitan laŭ tia maniero. Oni havus baldaŭ, se oni akceptus tiun ĉi regulon, centojn da malprave silabeditaj vortoj en Esperanto. Sed prenu *kv*, en ekvatoro, ekvilibro, ekvalento, akvo, likvido, trankvila, k.t.p. Ĉu estas necese ke oni ŝanĝu la *kv* de ĉiuj tiuj vortoj en *gv*. Tute ne! Ne eĉ por Franca parolanto.

La regulo, kiun Sinj. Fruictier eldonas, estas multe tro larĝa, eĉ por la Franca lingvo; kaj ĝi tute ne konvenas al la Esperanta. Ekzameni ĝin ni pli zorge!

La regulo diras ke se unu el la molaj konsonantoj *b, d, g, ĝ, ĵ, v* aŭ *z* sekvas unu el la malmolaj konsonantoj *p, t, k, ĉ, ŝ, f* aŭ *s*, la du konsonantoj fariĝos molaj: sed se la malmola konsonanto sekvas la molan, la du fariĝos malmolaj. Tio estas: *bp, bt, bk . . . fariĝos pp, pt, pk . . .*; sed *pb, pd, pg . . . fariĝos bb, bd, bg . . .*

Kion signifas "mola" kaj "malmola" konsonanto?

Oni faras molan konsonanton dum la laringo vibras, kaj malmolan konsonanton kiam ĝi ĉesas vibri. Nenio alia ol tio, pli aŭ malpli. Vibrado ŝanĝus la malmolan *p, t, k . . .* en la molan *b, d, g . . .*: kaj ĉeso de vibrado ŝanĝus la molan *b* en la malmolan *p*, k.t.p.

Ĉu estas eble ŝanĝi vibradon en ne vibradon, aŭ ne vibradon en vibradon, inter du konsonantoj?

*Jes, certe!!* Tio estas fakto de fiziologio.

Sed la regulo de Sinj. Fruictier signifas, ke la laringo devas necese, aŭ vibri aŭ ne vibri, dum la tuta daŭro de la du konsonantoj. Tia regulo ne havas la plej malgrandan fundamenton en la strukturo aŭ funkcioj de niaj organoj. Kaj se ĝi ekzistas, ĝi ekzistas per la volo kaj kutimo de homoj, kaj tute ne per ia fizika neceseco.

La vero fine aperas, sed ne la tuta vero. Kial niaj Francaj amikoj praktikas nepre tiun ĉi nenecesan regulon? Simple, je la komenco, ĉar ĝi estas pli facila: je la fino, ĉar ĝi fariĝas preskaŭ dua naturo.

Kaj la amo al la klareco, kiu sin montras tiel brile kaj hele en la tuta verkado de niaj agemaj najbaroj, montras sin ankaŭ en ilia kutima traktado de tiuj ĉi sonoj.

Ne estas bezono paroli tie ĉi pri la tuta aro da 14 konsonantoj kaj 98 kunmetebaj duoj. La plimulto da ili estas tiel facila, ke eĉ Franco, kiu kutime evitas ilin, povas ilin tuj elparoli, kiam li faras la penon.

La plej malfacilaj duoj estas tiuj, kiuj enhavas du fermitajn konsonantojn. La fermitaj konsonantoj estas *b, d, g, p, t, k*; ĉar ili fermas tute, dum certa tempo, la buŝon. Tiuj ĉi 6 konsonantoj povas fari inter si nur 18 duojn.

Restas 80 duoj, kiuj estas tute ne malfacilaj. Enestas en ili du specoj, unu speco kiu enhavas fermitan konsonanton (ekzemple *tv, vt, ds, sd*), kaj alia speco kiu ne enhavas fermitan konsonanton (ekzemple *zf, ŝv, vf, ŝj*).

Nek la unu speco nek la alia estas nature malfacila. La leganto povas certigi pri tio per la elparolado de la vortoj *glitveturi, bloutubo, apudsidi, disdoni*, aŭ de *rozfloro, pluŝvesto, pluvfonto, disĵeti*. La dua speco estas ĉiam tre facila. Estus perdo de tempo, rezoni pri tio. La eksperimentado tute sufiĉos.

Vera malfacileco trovas sin unue (kaj laste) en la 18 duoj, kiuj enhavas du fermitajn konsonantojn. Prenu ni la duon *bt*, kaj la vorton *subteni*, kiel ekzemplojn.

Ekzamenante zorge la metodojn laŭ kiuj oni elparoladas *bt*, oni trovas ke la Angloj havas unu metodon, kaj la Francoj du metodojn, sed ambaŭ diversajn de la Angla.

Sed oni bezonas scii ion pri la formado de fermitaj konsonantoj, antaŭ ol oni povos kompreni tiujn ĉi 3 metodojn.

Fermita konsonanto, plene formita, konsistas el silento kaj 2 bruoj. Ĝi enhavas tial 3 partetojn—(1), la alfrapantan bruon, kiu faras la fermaĵon; (2), la plenan fermaĵon, kiu produktas la silenton, kaj (3), la elfrapantan bruon, aŭ pafon, kiu formovas la fermaĵon.

Elparolante *aba, ata*, oni aŭdas kaj la alfrapon kaj la elfrapon de la *b* kaj de la *t*, sed ne la silenton: ĝi estas tro mallonga.

Sed elparolante *ba kaj ta*, ne estas plu aŭdebla alfrapo, nur elfrapo. La orelo tamen akceptas la elfrapon, aŭ pafeton, kiel perfektan *b* aŭ *t* konsonanton.

Sed elparolu oni *ab* aŭ *at*. Estas tiun ĉi fojon klara alfrapo; sed la elfrapo estas malforta kaj tre diversa. En Angla oni apenaŭ aŭdas la elfrapon: sed per kutima aŭdado, la Angla orelo povas rekoni la *b* per la alfrapo sola. Ekzemple, *Arab*.

Sed ĉe la Franco, estas tute kontraŭe. Aŭskultu, dum li elparolas *Arabe*. Oni aŭdas tute klare la elfrapon de la *b*. Kaj por lia orelo, sono, kiu ne posedas tiun elfrapon ne estas *b*. Por li la Angla sono ĉe la fino de *Arab* estas io simila al malforta *p*, sed tre malklara.

Rigardu nun la efektojn de tiuj ĉi cirkonstancoj sur la kunmetado de *b* (aŭ *d* aŭ *g*) kun *t* (aŭ *p* aŭ *k*) en la buŝoj kaj oreloj de la du nacioj. Nia ekzemplo estas *subteni*.

La Anglo havas solan kaj simplan metodon por trakti la aferon. Li prenas la alfrapon de *b*, kaj kunigas ĝin sub silento al la elfrapo de *t*, kaj sentas ke li estas elparolinta *subteni*.

Sed la Franco tute ne akceptas tiun ĉi metodon. Sono sen elfrapo, kaj kiu finiĝas preskaŭ sen

laringa vibrado, ne estas por lia orelo *b*, sed io multe pli proksima de *p*.

Tial li prenas unu el du vojoj. Unuflanke li povas preni la vojon de nia amiko S<sup>ro</sup> Fruictier, kaj ŝangi la *b* maltime en *p*—vojo kiu ŝajnas al mi trege danĝera por nia kara lingvo. Sed estas tamen alia vojo, kiu estas tute tiel Franca, sen esti tiel danĝera.

La Franco ofte kunigas realan *b* (aŭ *d* aŭ *g*) kun reala *t* (aŭ *p* aŭ *k*) per tiu tre ŝanĝebla sono, kiun li nomas *e mutan*: ekzemple, *robe turque*. Estus

multe pli bone diri ankaŭ *subteni*, k.t.p., kun tre mallonga *e*, ol detrui la perfektan fonetikecon de la lingvo per la dirado de *supteni*, k.t.p.

Mi tute povas kredi ke la Angla metodo de sola alfrapado kaj sola elfrapado por *bt*, k.t.a., ne estas praktikebla por la amaso da niaj Francaj kunbatalantoj. Tial tiu ĉi longa argumento kun ili pri alia metodo, kiu estus ne nur Esperanta, sed ankaŭ Franca

R. J. LLOYD.

*La Universitato, Liverpool,  
Aŭguston, 1904.*

## VEKIGA HIMNO DE INFANO.

(El Lamartine).

Esperantigis A. Motteau.

Ho, Patro kiun patr' adoras,  
Ni genuflekse preĝas Vin,  
Kaj kapklinanta la patrin'  
Deziras ke mi Vin memoras.

Ŝi diras ke elfaras Vi  
La belajn florojn de l' ĝardeno;  
Ke sen Vi fruktojn, ĉe l' mateno,  
L' arbejo havus ne por ni.

La mondon tutan Vi invitas  
Por partopreni en festen':  
Kaŝita en folihaven',  
L' insekt, eĉ l' unutaga, paŝtas.

La timianon ŝafidet'  
La stipon kaprinet' deŝiras;  
Dum muŝo laktan guton tiras  
El mia plena kaliket'.

El dika garbo grenereton  
Falintan sekvas alaŭdid',  
Grenventolilon paserid',  
L' infano sian patrineton.

Kaj, por ricevi ĉiun donon  
Senditan ĉiutage, Vi  
Nur volas ke humile ni  
Alvoku sanktan Vian Nomon.

Ja Vian Nomon kantos mi,  
Ĝin, kvankam temo por anĝeloj:  
Infanan voĉon, Dioreloj,  
En la ĥorego aŭdos Vi!

La bonan Dion mi petegos  
(Infanon ĉar aŝskultos Li)  
Ke donojn ne nur havu mi,  
Sed ĉiuj kiuj bezonegos.

Al fontoj akvon sendu, Di',  
Al almozulo panan pecon,  
Al la kaptito liberecon,  
Al orfo domon donu Vi.

Al la birdido donu plumon  
Kaj lanon al la ŝafidet',  
Pluvigu roson sur l' herbet',  
Al malsanul' redonu sanon.

Justecon en animo mia  
Restigu, ke Vin amu mi,  
Ke mia forto estu Vi,  
Kaj mia beno Volo Via.

## LA ELMIGRANTOJ.

Originalaĵo de Clarence Bicknell.

Li lasis min, esperoplena kaj kuraĝa,  
(Ho la ventet' somera ekĝemanta)  
"Ĉe la transmara land' mi trovos okupadon,  
Kaj baldaŭ, post alveno via, eĉ ricecon."

Li skribis, "Land' nebela estas kaj sovaĝa,  
(Ho forta vento de l' aŭtun' blovanta)

Sed mi laboron dolĉan havas kaj sanadon;  
Rapidu do, kaj al mi portu la belecon."

Tremante mi alvenis, post danĝer' vojaĝa,  
(Ho la ventego vintra nun muĝanta)  
Sed nur en Nevidebla Land' kun li vivadon  
Mi trovos, kaj la nun perditan feliĉecon.



## THE PROGRESS OF ESPERANTO IN GREAT BRITAIN AND ABROAD.

*The contents of this section are supplied by the Hon. Sec. of the London Esperanto Club, who invites all Esperantists to send monthly reports of the spread of the International Language in their districts. Communications must reach 14, Norfolk Street, London, W.C., before the 8th of each month.*<sup>1</sup>

There has been no Committee Meeting of the London Club this month. Some of the Members and the President are away, and the matter at present to be decided upon is so important and far reaching that a general vote of the various Esperanto centres has, as far as possible, been taken by letter instead.

The question to be decided upon is this: Has the time now come for a general federation of all British Esperantists? So far the answer is wholly affirmative, and by the time this October issue appears the majority will have given their decision—yes or no. If by any chance anyone has neglected the circular sent for consideration, will the defaulter please look up that paper and return it with the needed comments at once.

The circular has been sent to every member of the London and Keighley Societies, and to the Committees of the various Groups for distribution amongst their own members.

A General Meeting is called for the *first* week in October, and notice of this will be sent by post-card. If the Federation becomes an accomplished fact, the next point will be the choice of a Committee to draw up the Constitution and decide upon the Officers.

Curiously, the name has been a difficulty; "English-speaking" is too wide a term, as we have no doubt that the United States will have its own centre soon. "British" is too narrow, for some will think it will leave out our Colonial or Celtic members. We Esperantists have coined one word, "Samideano," to express an idea of friendship, but the suitable all-embracing word for our contemplated union has not yet been devised, and from the nature of things a compromise will have to be accepted.

The next question is a question of funds, of course. Have we any self-denying Esperantists amongst us? Or are we each going to wait and see whether our neighbour will put hands in pocket first? The London Club has, as is natural, borne all the expense of this preliminary enquiry, but the Central Society will have to shape its doings by its income.

*Classes in and around London.*

After a summer of Congresses and such like, we are now settling down to our regular winter work. Unfortunately we cannot have the Finsbury

Circus rooms this year, and, at the time of going to Press, a definite arrangement had not been made. Will those of our Members who could go to 185, Oxford Street, please write to Miss A. Schafer, 8, Gloucester Crescent, Regent's Park, N.W.

The Principals of the Gouin School kindly offer us the use of their Oxford Street rooms.

Miss Schafer's lessons will be entirely in Esperanto (Conversation, Reading, etc.). A beginners' class is also being arranged for, which Mr. Millidge will take.

On Tuesdays a class meets, by the courtesy of Messrs. Hatchard & Castarede, at 71, High Holborn. Applications should be sent to C. F. Hayes, Esq., 48, Swanage Road, Wandsworth, S.W. Here, also, beginners and those more advanced will find help, and a library is in formation.

Monday evenings, as usual, at The Club Café, 5, Bishopsgate Street Within, E.C. Tea at 6 o'clock. The Members afterwards adjourn to 100, Gracechurch Street, where the Remington Typewriter Co. have kindly placed a room at their disposal.

A class for German-speaking students, conducted in German, is held by Miss Schafer, on Thursday evenings, at the German Club, Charlotte Street, Fitzroy Square. For particulars apply to Miss Schafer, as above.

*Forest Gate.*—The Members meet weekly on Thursday at 7.30 for conversation and social intercourse. Dr. Batteson, of 39, Woodgrange Road, kindly receives them at his house. The beginners' class is from 8 to 9 o'clock on the same evening, A. Motteau, Esq., 157, Earlham Grove, being the lecturer.

*Battersea.*—A. T. Lee, Esq., of 2, Cupar Road, Battersea, writes that the meetings are at the Latchmere Baths on Tuesday evenings at 7.30.

*Ilford.*—This Group meets at the house of J. Kent, Esq., 42, Park Road, Ilford, on Friday evening at 7.30. He will gladly reply to all inquiries.

*Brixton.*—E. W. Eagle, Esq., of 22, Kellett Road, is again arranging for this Group.

*Leytonstone.*—Any in this neighbourhood interested in Esperanto are requested to write to Herbert Farnes, Esq., Rozel, Percy Road.

*E. Dulwich.*—G. W. Bullen, Esq., 17, Thorncombe Road, will again arrange to receive Esperantists, if a sufficient number desire it.

<sup>1</sup> *The Editor is not responsible for the opinions expressed in these Club reports.*

*The Esperanto Society, Keighley.*

Mr. Rhodes will open the Session with a paper on "Artificial Languages" at the Keighley Municipal Technical Institute, which, like Liverpool University, inserts an Esperanto syllabus in its prospectus. Mr. Rhodes himself is still occupied with the preparation of his dictionary, which from day to day needs enlarging, as more technical terms are added to our vocabulary.

*General Group News.*

(Addresses of Hon. Secretaries on outside cover.)

Our pages have had to be prepared so early this month that full news has not yet come to hand, and enquirers should write to the several secretaries.

From *Brighton* Miss Oxenford reports a very pleasant meeting on the 3rd September at the Remington School, 12, St. George's Place. Saturday, at 8 o'clock, is the regular day and hour. Mr. Lambert, the President, has been exploring other artificial languages with the usual result—that no one of them can compare with Esperanto, however ingenious it may be.

G. H. Taylor, Esq., 9, Norman Road, Huddersfield, would be most grateful if any not too far off Esperantist could arrange to come and give a lecture there; and F. G. Rowe, Esq., 51, Portland Road, Nottingham, has a like desire.

Dr. Mayer, Central Hall, Manchester, announces lectures at the Gouin School of Languages, 2, Victoria Street.

Dr. Greenwood (Portsmouth) announces that the classes at his house have recommenced, and will continue on Tuesday evenings all through the winter. He and Mrs. Greenwood will be pleased to see or hear from enquirers.

The *Plymouth* classes meet at the Ruskin Institute, which has kindly placed a room at their disposal. The members of the Social Democratic Federation have become strongly interested, and the Tuesday evening meetings are well attended. The new Hon. Secretary is Arthur T. Grindley, Esq., 23, Gifford Place, Plymouth.

Mr. Haxton writes that great interest is felt in St. Andrews, and he hopes for a very encouraging session.

*Newspapers.*

*La Chronique*, a French journal, published in London, has had a series of most interesting papers, beginning with a description of the Dover Congress, which provoked a letter from Professor Hamonet. In this letter he takes up the old contention, that to propagate Esperanto is to commit a mortal sin, because if men ever come to use this language as a common international means of

doing business it will infallibly follow that they will neglect the study and practice of their own languages; and, thus forgetting them, they very soon will fall into desuetude; thus, *chefs d'œuvre* of national languages, which have so powerfully aided in the progress of science and the spread of humanity, will be neglected and disused, that is to say, that if we use Esperanto as an auxiliary language, Shakespeare and Goethe, Victor Hugo, Schiller, Milton, and the rest will soon be mere names connected with a distant past.

To this M. Michaux, of Boulogne, replies in the issue of August 27th (further letters follow) by explaining that M. Hamonet knows only a part of the truth, that he does not realise that in France the Minister of Public Instruction and other such encourage our work, that many Esperanto translations are made by professors of high standing in the various Universities. He then suggests that, instead of theorising, Mr. Hamonet would do well to study practical effects, and tells him a little story by way of warning. I can only briefly sum up this story.

A hundred years ago an American sought an interview with a monarch. The American had made a model of the first steamboat, and he thought he had brought it to a person who would properly appreciate it. Fulton, the American in question, had managed to have the little boat placed on the lake in front of the Palace windows, and pointed it out to the great Chief. The great man answered, "Oars and the wind have been from all time the sole means for the propulsion of boats, and no other way is possible." "But, Sir," said the gentleman who had introduced him, "if you will just glance at the lake in front of you, you will see that the little model of the inventor does move by other means." The Monarch appeared for the moment astonished; he saw the marvellous boat, he heard the cries of the people and the applause of the helpers, then he became angry, and at last disdainful, shrugged his shoulders and said, "It is not because this little boat goes automatically without oars and against the wind on a little piece of water on my park, that the attempt of this stranger will conquer the world; such things are not born in an hour; every race has developed the art of navigation, but the means of propulsion have remained invariably the same; sails and the oar propelled a boat in prehistoric times, and will continue to be the only motor power. Tell this ambitious young man that my navy and commerce have not waited for his invention to be prosperous, and if men adopt his invention they would neglect the study and practice of navigation, and the victories of our heroes become useless."

Mr. Ellis, of Keighley, contributed a fine article on Esperanto, last August, to the *Law Times*. It was entitled "Esperanto for Lawyers," and point by point the suitability of our language for law purposes was clearly shown. One interesting argument was taken from a report in the *Internacia Scienca Revuo* upon a Russian boy who died of a very rare disease. Valuable scientific information was called forth at the inquest, and accurately given in the *Revuo* through the medium of Esperanto.

Mr. Ledger sends a most interesting summary of articles contributed to the *Phonographic Monthly*. This paper is printed in shorthand, and here is a list of articles:—

April, 1904.—J. French. Visit to Havre and practicality of Esperanto.

May.—T. Bailey. Outline of Esperanto, but doubts whether Pitman's be suitable.

August.—G. Ledger. Shows that the phonetic principles upon which Esperanto is based make it admirably adaptable, and gives illustrations.

September.—J. Catton. Continues the subject, challenging Mr. Bailey's assertion in May.

#### *News from Abroad.*

Count Gallois writes from Italy: "We are progressing very well indeed here. Many daily journals are publishing articles about our language, and the idea of it is rapidly gaining ground. On the 16th of August a Russian Esperantist, Sr<sup>o</sup> Kolovrot-Cervinski, paid us a visit at Riolutano, and we had long and most interesting conversations with him, our members all understanding quite easily."

From Hamburg comes the news that a Group has been founded, Dr. Mybs, of Altona, being President; his address is Markstrasse 68, Altona, Elbe. Dr. Lindinger is Secretary.

The *Esperantiste Mitteilungen* says:—"We are happy to state that Germany, which for a long while has not taken Esperanto seriously, has now shown an earnest reviving interest. The Berlin group has sent out some 10,000 brochures and leaflets. Hanover has had a good meeting of shorthand writers. Hildesheim, Stuttgart, Königshausen, and Schleswig are planning new developments, as are various other towns."

Mr. Müller, the director of the Modern Language Institute in Iserlohn, very much approves of Esperanto.

Sinjoro C. Barttel, of Woehlerstrasse, 14, Frankfurt-on-Main, writes that he has founded an Esperanto Society in that city, and will be delighted to hear from English Esperantists.

From Sinjoro Werner, St. Gall, Switzerland (the Vice-President), comes the announcement that the Society there, now numbers 42 members, and from Vienna we have the encouraging news that an Esperantist Society has been formed.

Canadian readers will learn with interest that a Group has been founded in Winnipeg. Members meet every Friday evening from 8 till 9, at the residence of Mr. W. A. Pierce, 264, Selkirk Avenue.

Dr. Zamenhof, some little time ago, contributed an article to the *Independent*, a weekly U.S. journal. Mr. Mudie prepared the English version, but forgot to ask that a copy should be sent to him. No one of us has seen the article, but letters in consequence of it have reached the London Club from nine or ten American cities, and it will be very interesting to follow out the result of this article. We hope to have a copy of it before long, and will certainly give our readers the benefit of it when it comes to hand.

From a visitor to the St. Louis Exhibition we hear that the Esperanto stall there is attracting a great deal of attention—the various national grammars, journals, etc., being prominently shown.

#### *Items of Interest.*

Chess players who want correspondence-play with foreigners may apply to Mr. Ellis, Keighley, who can furnish opponents. The chess terms and method of notation have been translated into Esperanto by Mr. Ellis, and published in the "Lingvo Internacia." Such of the contractions as are needful for correspondence-play Mr. Ellis will willingly make known to those about to play.

During the visit of the Boulogne Esperantists to London, M. Michaux and his party were conducted round the museum of the British South African Company, London Wall, and the interesting exhibits from Rhodesia were duly explained to them in Esperanto by the officials. The occasion was very interesting, and will doubtless be repeated, as the Company have many foreign shareholders.

#### *Pan-Celtic Congress.*

This Congress, which met at Carnarvon, and at which members from many countries were present, decided, after a very interesting discussion, "That a committee should be appointed to discuss the suitability of Esperanto as a means of communication." It had been prefaced by a somewhat amusing, though passionate, discussion. The Cornish Celts said that the Celtic tongue would answer the purpose. Their motion was agreed to, but when the question was asked which Celtic tongue, they at once said, "Why, the Cornish, of course," and an uproar was the result, all preferring their own dialect.

## LA LIBERTEMPULO.

Originele verkita de H. W. Southcombe.

Kiam somero revenas, venas ankaŭ familia frenezeco.

Patro, patrino, geinfanoj, hundeto kaj, ne mal-ofte, katino kaj kanario, ĉiu el ili kredas sendube, ke ili devas veturi marbordon.

Neniu scias la devenon de tiu ĉi spirita malsano, kaj mi multe dubas ĉu alilanduloj ankaŭ tiel malbone suferas.

La patro de familio estas kutime viro sufiĉe racia.

Lia propra dometo estas eble malvarmeta, freŝa kaj higiena. Tie, ĉio estas konvena kaj sufiĉe vasta. Tie, se ie en la tuta mondo, li povas kontentigi siajn proprajn gustojn kaj eĉ siajn imagajn bezonojn. Estas lia hejmo.

Sed li havas iluzion. Li kredas ke li devas forlasi sian hejmon kaj ĝian tutan enhavon dum kelkaj semajnoj, kaj ke li ne povas esti feliĉa antaŭ ol li forĵetos ŝtonetojn en la maron, kaj flaros la putrantan markreskaĵon.

Krom tiu ĉi iluzieto, li ne havas la plej malgrandan malsanon, sed tamen li devas iri al la marbordo por resaniĝi.

Li kredas ankaŭ ke fenestro, tra kiu li povas rigardi la maron, estas multe pli bona ol ĉia alia; kaj kiam la afero estas aranĝita kun la mastrino, kiu luigas la loĝejojn, kaj li estas promesinta pagi dum kelkaj semajnoj sufiĉe da mono por aĉeti novan dometon, li komencas kredi, ke li baldaŭ atingos plenan feliĉecon.

Ĉe la loĝejo estas granda amaso da gepatroj, infanoj, infanistoj, pakaĵoj; kaj dum kelkaj tagoj li iom post iom ekscias kiun ĉambron estas definitan al kiu persono.

Nokte, li laciĝas kaj dormas - eble - se la du supra-etaĝaj fraŭloj estas revenintaj hejmen, se la infano ne ploras malsupre, se la gesinjoroj ne ronkas ambaŭflanke, se neniu piedfrapas la trairejon, se la senaereco de la ĉambro ne sufokas lin, se bela nigra hundeto (kun blua rubando ĉirkaŭ la kolo kaj malgranda sonorileto), ne kuradas sur la ŝtuparo, se la najbara gekataro ne kunvenas ektere, se li povas elpeli el sia kapo fantaziojn pri skaraboj, pri muŝoj, k-t-p.

Ĉiutage, multe da alilanduloj, kaj samlandanoj, penas amuzi la Libertempulon.

Italoj per dancoj, per simioj, per akordionoj, per senĉesaj gurdoj.

Sinjoroj parolantaj la Germanan lingvon ludas antaŭ li antikvajn, dikegajn, flavkuprajn blovinstrumentojn kaj blekemajn klarnetojn.

Germanujo estas muzika lando, kaj la muziko ne konas ian nacian limon, sed atingas rekte la koron de la tuta homaro.

Sed tio ne plaĉas nian Libertempulon, kaj li estas malagrabla kontraŭ sia edzino, kaj deziras piede elĵeti la loĝejan-katon (kiu, oni diras, tre ŝatas la manĝaĵojn de la vizitanto).

Kion vi havas, karulo? diras la kompatinda edzino, sed li ja ne konas kion li havas. Efektive, li suferas de sia mezasomera frenezeco.

Iam li veturas kune kun sia familio, sed la infanoj ne ŝatas veturi, kaj maljuna ĉevalo ne volas ilin posttiri.

La infanoj volas nur fosi la sablaĵon, konstruigi kastelojn, kaj spruĉi la marakvon. Ili ne volas marŝi supre multe da montetoj, kaj la veturo ne prosperas.

Poste, li pensas pri la "Coach," bela kvarĉevala veturilo zorgata de viro kiu mirinde blovas longegan kornon. Li do sidigas sur la supraĵo, kune kun dek aŭ dekdu aliaj. Pluvas, kaj ĉiu el ili deziras starigi sian propran pluvombreton. Tio ĉi okazigas grandan malamikecon inter ili dum tri horoj for, kaj tri horoj re-veturante.

Li ĵuras neniam ree veturi, sed estas simptomo de tiu malsaneco ke li nepre iros ree morgaŭ, kaj kredos ke la vetero sendube estos bonega.

Je alia okazo, li suriras vaporŝipon, kiu faras tuttagan vojaĝeton. Liaj prapatroj estis "regantoj de la ondoj" tial li ankaŭ faros marvojaĝon.

Multe da aliaj "regantoj" ankaŭ enŝipiras kaj apenaŭ estas spaco por sidigi.

Muzikistoj kiuj gaje ludas violonojn, glasojn, aŭ harpon, rikoltas iom da pencoj kaj malaperas malsupren. Ili bone antaŭscias ke, iom poste, niaj novaj maristoj ne plue bezonos ian muzikon.

Ilia gajeco baldaŭ malaperos, ili fariĝos pensemaj, kaj fine, ĉiu el ili malbenos la tagon de sia naskiĝo, kaj nur deziras esti permesata morti.

Estas simptomo de tiu ĉi somera malsano, ke morgaŭ la malsanulo denove suriros vaporŝipon kaj kredos, ke la maro sendube devas esti trankvila kaj ebena.

Kiam, post multe da tagoj, li fine atingas sian propran domon, kiam rave li vidas ĉian karajon, li ekdubas ĉu li ne estas havinta ian spiritan malsaneton, kaj ĵuras neniam ree veturi marbordon.

Kaj tiu ĉi decido daŭros—nur ĝis la sekvanta somero.

Ĉar estas simptomo de tiu ĉi malsano, ke oni tute forgesas ĉiun ĉagrenon, kiu okazis dum ĝia daŭro.

## ĈITUO, LA LUPO-KNABO.

Vera rakonto el Hindujo.<sup>1</sup>

Originale verkita de Alfred T. Simper.

Sur la bordo de la Ĉenabo vivadis bovisto kaj sia malgranda familio. Ĉiuvespere lia edzino, prenanta sian infanon Ĉituan, eliris por kolekti verdaĵojn por la vespermango. Kuŝigante la infanon sur la herbo, ŝi ofte vagis dum duonhoro.

Unu tagon, revenante al la kuŝejo, la infano ne ĉeestis kaj, kio estis pli terura, senkrie estis malaperinta. Nur liaj malmultaj kovriloj restis.

La timiga penso, ke sovaĝa besto estis forpreninta ŝian knabeton, tuj prezentis sin al ŝi. Laŭtkriante kaj brustbatante, ŝi ĉirkaŭradis tiel, kiel tigrino farus je simila okazo. La vilaĝanoj, armitaj de bastonoj kaj tranĉiloj, kunigis kun la malfeliĉaj gepatroj, kaj faris serĉon. Nenio rezultadis kaj, kvankam la ĉirkaŭaĵo estis ĉiutage trairata de bovistoj kaj ŝafistoj, ili ne povis iajn postsignojn trovi.

La afero estis de tiam forgesata de ĉiuj, krom la gepatroj.

Tri jaroj pasis.

Unu vesperon kelkaj knaboj arigis la bovojn kaj, laŭ la kutimo, la bestoj alproksimiĝis al la rivero por trinki. Subite ekkriegis unu knabo: "Lupoj, lupoj."

Je tio ili faris grandan bruegon. Patrino kaj siaj idoj rapide forkuris, lasante harkovritan estaĵon—duonsimian, duonknaban—kiu malpli rapide sekvis ilin, kvarpiede.

Kompreneble, la knaboj ĉasis tian kuriozaĵon sed la lupino returnen kuris. Tiam la ĉasantoj rapide forkuris, kaj, hejminginte, rakontis pri stranga simio, kiu mankis voston, kaj akompanadis la lupinon.

Dek malfeliĉaj jaroj pasis, kiam la patrino vidis luparon inter kiu estis io, duonhoma, duonbesta, malrapide kuranta. Pri tio ĉi oni sciigis Anglan sportiston, kiu tiame ĉasadis en tiu regiono. "Sparu filon mian, mi petegas, kaj nemortigite revenigu lin!" plorpetis la patrino.

La Anglo tutkore klopodis pri tiu ĉi afero. Li kunvenigis la plej spertajn *ŝikariojn*<sup>2</sup> kaj foriris al la bordoj de la ĉenabo. Pretigante allogilon kaj ĉiunoktespionadante, ili penadis kiel eble plej multe por kapti la beston.

Tiamaniere pasis monato, sed la Anglo ne volis maltrafi. Nu, unu nokton, dum li sidadis en lia kaŝejo observante la kaproviandon, kiu estis la allogito, du lupoj aperis, kune kun stranga kamarado.

La kaŝulo tuj eltiris sian pistolon kaj pafis je la plej granda. La patrino morte falis teren, la pli juna forrapidegis, la duone homa besto sekvis ĝin lame.

"*Ŝikari, ŝikari, leviĝu!* Ne pafu!" kriegis la Anglo.

La *ŝikario* kun ŝnuregoj kaj bastonegoj ĉasis la estaĵon kaj kaptis ĝin. Estis la lupknabo. Li nudigis siajn blankajn dentojn kaj surĵetis sin sur ili. Sed li ne povis plene ekzerci siajn membrojn, kaj baldaŭ estis ligata per fortaj ŝnuroj.

Je la tendaro, oni alligis lin al tendstango per ledrimeno ĉirkaŭ la talio. La lupknabo rifuzis mantaĵojn kaj sopire rigardis la arbaron, kie estis siaj kamaradoj. Hunde, li ĝemadis kaj blekadis; kaj, je ies alproksimiĝo, li ĉirkaŭe saltetis, kiel simio.

La patrino alvenis por vidi sian knabon. La tuta korpo estis kovrata de molaj haroj, kaj la ungoj estis fariĝintaj pintaj ungoj.

Tiu nokton, stranga sono estis, aŭdata en la tendaro. La dormantoj vekigis, kaj, elkurinte, ekvidis, la lupknabon forkuranta kun siaj frat-lupoj, kiuj morde estis disrompintaj la rimenojn por liberigi sian kamaradon. Kelkaj senkuglaj pafoj disigis la lupojn, kaj la knabo rekondukiĝis.

Diris la Anglo al la mizera patrino: "Lastu vi la knabon kun mi dum unu jaro, ĝis ni lin resentebigos je la homa influo."

Tiel la aminda sportisto kun la stranga estaĵo forlasis la arbaron.

Iom post iom, Ĉituo estis instruata preskaŭ vertikale staradi. Sed lia korsento restis en la densa arbaro. Kiam ajn li vidis hundon, li kurligis por ĝin karesi.

Estis evidente ke, el ĉiuj ligiloj, kiuj iam altenis lin al la homa gento, ne unu restis. Efektive, li nun estis kvazaŭ senanima besto.

Sed la nova vivmaniero subite finiĝis ĉar, post malmultaj tagoj oni trovis lian senvivan korpon sur ĝia pajla lito.

Tamen la patrino ankoraŭ faras longajn pilgrimadojn por ke ŝi eniru la pli feliĉan mondon, kaj tie renkontu sian knabon,—lupo-knabo kvankam li estis.

<sup>1</sup> *Tiu ĉi historio estas tre bone konata inter la Sportistoj en Lahore.*

<sup>2</sup> *Ŝikari estas Hinda vorto signifanta Sportisto.*

## PLENDKAŬZO KAJ RIMEDO.

Kimra Historio rakontata de E.W.

Antaŭ okdek jaroj Anglujo kaj Kimrujo same suferis je arbitra imposto kiu, jaro post jaro, plipeziĝis. Por havigi monon por ripari la vojojn ĉiuj rajdataj aŭ tiran taj bestoj, kaj ankaŭ ĉiuj bovoj kaj ŝafoj kiuj marŝis sur la vojoj, submetiĝis al imposto. Por kolekti tiun ĉi monon oni starigis grandajn pordegojn ne tre malproksime unu de la alia. Ĉe ĉiu pordego estis malgranda dometo de la monkolektisto.

En kelkaj lokoj la imposto estis tiel peza kaj la pordegoj tiel multaj ke ĝi estis vera ŝarĝo je la farmamastroj. Ekzemple, ili kutimis bruligi kalkon por riĉigi sian teron; kiam pordego estis inter la bruligejo kaj la farmo, la mastro ofte devis pagi *tri ŝilingojn por ĉiu ŝarĝveturilo plena je kalko!*

La laboristo kaj la mastroj plendegis, sed vane.

En la jaro 1839 kelkaj pordegoj estis mistere ĵetitaj teren kaj ne rekonstruiĝis, pro loka perforto. Dum tri jaroj oni faris nenion plu, ĉar la Kimroj estis ordemaj, kaj respektis la leĝon. Sed fine ili ekkonis ke ili devis sin protekti. Ili trovis kapitanon (aŭ oble kapitanojn) kiun ili nomis Rebeka kaj perforte ili ekposedis la pordegojn de siaj malamikoj. Tage ĉie estis paco, sed vespere en lokoj multe da mejloj malproksimaj, oni aŭdis bruojn de kornoj, de pafiloj, kaj piedfrapadon de homoj kaj ĉevaloj. Morgaŭe, la magistratoj sciigis ke multaj pordegometoj estis detruitaj. Soldatoj estis sendataj en la landon, sed ili malsaniĝis, ĉevaloj mortis, kaj oni povis kapti nek Rebeka'n nek unu el liaj filoj. (Tiatempe mi estis en Anglujo, kie mi ofte aŭdis, ke Rebeka estis magistrato mem, eksoficiro, landsinjoro kaj de familio honorinda. Oni ankaŭ diris ke li nepre estos kaptata kaj pendigata. Mi havis karan boonklon pri kiu ĉio tio estis vera, kaj mi maltrankviliĝis pro li).

*En Martineau's Historio de Anglujo ni legas:* "Foje ili detruis pordegon malpli ol kvarono da mejlo de la magistrata kunvenojo. Se la portistoj gardis, ili certe ne vidus lumon aŭ ian alian signon; se ili eliris por aŭskulti, neniu proksimiĝis, sed se ili forgesis aŭ dormis ilin ekvekis la blovo de multe da kornoj kaj la krako de pafiloj. La pordo estis perforte malfermata, kaj ili vidis amason da homoj, kelkaj en virina vestaĵo, kaj aliaj kun vualoj kaŝantaj la vizaĝojn. Ili portis brilegajn torĉojn, segilojn kaj armilojn. La portistoj devis movi sian meblaron aŭ ĝin perdi; fortaj manoj helpis porti liton, tablon kaj meblojn sur la kampon, aliaj manoj segis la pordstangojn apud la tero, kaj dishakis la pordegojn. Tiam disŝiriĝis la tegmento de la

dometo, la muroj ruiniĝis, plankoj suprentiriĝis kaj la vojo estis libera por la vojaĝantoj.

"Tiam la amaso rajdis al malproksima loko, kie ili refaris tion saman. Nur en Carmarthen-shire preskaŭ okdek pordegoj detruigis, kaj en du apudaj graflandoj apenaŭ unu restis."

La Rebekidoj eĉ pafis en la fenestrojn de la magistratoj. En la ĉefurbo Carmarthen ili penadis detruigi grandan almozulejon, sed, antaŭ ol ili finis tiun ĉi laboron, alvenis multe da kavalerio. En la batalo multe da Rebekidaj vundiĝis, kaj kelkaj centoj estis kaptitaj.

Post tiu ĉi batalo, la aferoj de la ribelanoj ne prosperis. Kelkaj Angloj aliĝis al iliaj rangoj, kaj oni kredas, ke tiuj ĉi alilanduloj estis perfiduloj. Ĉiuj iliaj planoj estis antaŭsciitaj de la magistratoj, kaj malhelpataj. Sed la afero pligraviĝis. Oni komencis bruligi la gren-garbarojn kaj fojnon de la magistratoj, kaj tiujn de iliaj luantoj. La timo al Rebeka farigis tiel granda, ke la juĝistoj ne kuraĝis kondamni la bruligistojn. Foje, kiam maljuna virino estis pafita, la juĝo estis: "La malvivulino mortis pro fluo de sango en la bruston, kio sufokis ŝin; sed la kaŭzo de tiu ĉi sangofluo ni ne povas eltrovi!"

Sed la ribelanoj ne ĉiam estis kruelaj. Ili distingis inter la bonuloj kaj malbonuloj. Ekzemple, unu magistrato estis forta malamiko al la Rebekidoj, sed ankaŭ li estis edzo fidela, patro aminda, kaj landsinjoro bonega kaj simpatia. Unu matenon aŝiĝis vidiĝis gluitaj al ĉiuj liaj pordoj: "Ne timu pro via familio, aŭ pro via posedaĵoj. Rebeka ne volas ion difekti, kio apartenas al vi."

Kompreneble, la Rebekidaj, venkiĝis, sed iliaj laboroj ne estis senfruktaj. Kune kun la komisionomata juĝi la ribelanojn, alia komisiono sendiĝis por ricevi informojn pri la kaŭzoj de la ribelo.

La registaro neniam penadis eltrovi kiu estis Rebeka kaj, inter la Rebekidoj, nur tri transportiĝis kaj kelkaj estis dum mallonga tempo enmetitaj en malliberejon.

La Parlamento efektiviĝis leĝon, kiu multe malpezigis la vojajn impostojn. Oni nur devis pagi unufoje inter sep mejloj (dek unu kilometroj) kaj, post unu pago, oni povis trapasi unu pordegon tiel ofte kiel oni volus dum dudek kvar horoj, t.e., de noktomezo ĝis noktomezo.

Anglujo ĝuis, kune kun Kimrujo, tiun ĉi plibonigon, kaj nun la imposto estas preskaŭ neniigata. Nur en malmultaj lokoj, precipe pontoj, oni devas pagi vojimpostojn.

Nunaj veturantoj ŝuldas multe al la Rebekidoj.

## CORRESPONDENCE NOTES.

Doctor Zamenhof away from Warsaw! The idea is as startling as that of a Pope from Rome. Nevertheless, this consummation is about to be realised, and all good Esperantists will rejoice accordingly.

During the recent meeting in Calais, Maitre Michaux made use of the opportunity to kindly propose an International Congress next August at Boulogne. It is to this attractive function that our esteemed master has promised to do his very best to be present.

Let all Samideanoj who can manage to go make a note of the date and greet him there.

Men of ideas are a boon to Esperanto, and *vice versa!* Our "Holiday Captain," Mr. Reeve, has devised two novelties, announced on the cover. The "Esperantist's Signal" is introduced as a more occasional sign than the Badge for mutual recognition. Its display being optional, travellers will readily perceive the respective advantages of the two devices.

Readers will notice among the advertisements another example of an Esperanto name being given to a trade article. Several friends have referred to this novel plan, which calls attention to the wares in question and to Esperanto at the same time.

Several correspondents have expressed their satisfaction that music has again found its way into THE ESPERANTIST. It often happens that Groups possess good quartettes, and Esperanto part-songs are much in demand. Next month another new song and words by Mr. Rowe, of Nottingham, should appear, and musical contributions will always receive careful attention, and be inserted whenever possible.

The next issue should contain another story by H. G. Wells, translated by Dr. Martyn Westcott. This author is busy preparing a translation of the *Christmas Carol*, which will, when published, give especial pleasure to our foreign friends—such sincere admirers of Dickens' genius.

Press notices of Esperanto have been numerous this month. Far and away the most valuable of recent newspaper articles is a long and able treatise by Mr. Albert Dudeney, which appeared in the *Bedfordshire Times*. An attractive reprint, in brochure form, will be sent on receipt of 2d. in stamps.

Reprints of the *Unua Leciono*, by Rev. R. A. Davis (pp. 151—4), can also be had. Price 1s. for 30.

The word employed for Welsh in No. 8 was adversely criticised as being synonymous with "of or appertaining to gall." Dr. Zamenhof has kindly replied to my inquiry. He prefers *Kimra* for Welsh, *Kimro* Welshman, and *Kimrujo* Wales.

The *Cwmry* will assuredly be well pleased at the incorporation of their national sobriquet in "The Second Tongue for All."

Referring to No. 7, some correspondents have asked for an explanation of the German system of telling the time. It is briefly thus:—

As soon as the clock has struck, say, five, the sixth hour has commenced. Thus half-past five is expressed as *halb sechs*, *half of the sixth hour*, *la duono de la sesa*. This, of course, is most perplexing to Englishmen.

Captain Tudor, R.N., writes suggesting the adoption of the international railway system, by which *half-past five* is  *kvin tridek (5.30)*. This method was recommended in No. 8, which had not reached the China Seas when he wrote. No doubt Captain Tudor will be interested to learn that this latter system works perfectly abroad. Esperantists should use no other.

Another danger in Esperanto is the alteration of place names. Do not address your Fleet Street friend's letters to *Rapidega Strato*. A friend living in *Lazarskaja* has even received letters addressed to *Strato de la Almozuloj*. This reflects great credit on the local post office.

THE ESPERANTIST has sinned in this matter, using such locally adopted forms as *Bulonjo*, *Kalezo*, *Kastelteodoriko*, etc. Now a French friend talks of writing to fellow students in *Lejstro*, *Niukaslo*, and *La Insulo de Uajto!*

Let us continue to employ, for postal purposes, the names commonly in use for the town in question, not even adding the apparently harmless "little O." Our friends in Louvain have often missed their letters through giving their address as *Loveno*, whereby Italy receives what is not hers, the Post Office has unnecessary trouble, and the non-arrival of the letter is ascribed to the negligence or lack of courtesy of the sender.

The Editor regrets that a delay has occurred in the preparation of the postcards for illustrating the use of the Esperantic Participles. They are now almost ready, and form an interesting addition to the host of propaganda postcards already in use. (Price, 8d. per dozen).

# Amikeco

WORDS BY BEN ELMY  
MUSIC BY J. HADFIELD.

*Ne tro rapide*

1. Kant-u ni est-ontan amik-e-con De l'hom-ar-o en la ter-o;

*FINO*

*10m malrapide*

1. Nobl-an pac-an inter-naci-ec-on Ni dis-sem-os ĉe la sfer-o.

*al tempo*

2. Frat-oj—Angl-oj, Francoj, kaj Ger-man-oj, Kant-u do, en Esp-er-ant-o;

3. Ĉe la nov-a kaj mal-nova mond-o Un-u ling-vo un-u kor-o

*D.K.*

*10m malrapide*

2. Ĝis ĉe ĉi-uj O—ce—an-oj Eĥ-o—iĝ os sam-a kant-o.  
3. Ĉe At-lant-a kaj Hinduja ond-o Re-son-iĝ-u pac-a Ĥor-o.







# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.

AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitujn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvuloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

Vol. I., No. 13.

NOVEMBRO, 1904.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 8, 6d. each; Nos. 9 to 12,  
4d. each, net.

Several correspondents have written for my opinion on the new British Esperanto Association.

The success or non-success of the undertaking largely rests on its ability to convince the British Esperantist that it is to his or her advantage, social or financial, to become a Member of the Association *direct*, as well as participating with a local group, under a capitation fee. This advantage may not be apparent at first sight, but I firmly believe that, with efficient management, it will be realised by those who are public-spirited enough to become Members of the central body. Correspondence Bureau, Hotel arrangements, Commercial Exchange and Mart, Lending Library, Social Gatherings, Examination facilities, etc., should bring a large and increasing membership.

But it is absolutely necessary that the enterprise be begun with courage and determination. No success may be reasonably expected unless a permanent office be engaged, and an Assistant (paid) Secretary be appointed, who may be always in attendance there to answer inquiries. If its promoters are contemplating a less venturesome line of action, I am strongly of opinion that the proposed Association will be at best but a weak measure, and end in disaster. The only excuse for this latter course would be an unfortunate lack of funds.

Will not some one among our friends, well provided with this world's goods, be disposed to generously advance a small sum (at interest, if needs be) sufficient to start the Association in a manner befitting its comprehensive title? The Hon. Secretary is:—Harald Clegg, Esq., 39, Constantine Road, Hampstead, London, N.W.

Personally I greatly regret that, as announced at the Inaugural Meeting, I have not the leisure to take any official part in the work of this desirable organisation, but heartily wish it every success.

*Voĉo el la Himalajo.*—Eble, pro la konata disvastiĝo de la kara lingvo, vi ne miros lerni, ke Hinda monaĥo, loĝante en la soleco de la Himalajo, sesdek mejlojn for de la fervojo, kaj multaj mejloj malproksime eĉ de poŝtoŝtato, allogiĝis je ĝiaj ĉarmo.

Ŝajras al mi, ke Esperanto rilatas tiel al la mondaj lingvoj, kiel Vedanto rilatas al la religioj de la mondo. Esperanto donas internacian lingvon al la parolantoj de ĉiaj lingvoj, kiel faras Vedanto, donante al ĉiaj religianoj komunan spiriton, aŭ religian subapogon.

Plue, tiel en la unu oni ne devas forlasi sian nacian lingvon, tiel, en la alia, oni ne devas forlasi nacian religion.

Saĝe diris Max Muller: "Vedanto havas spacon por preskaŭ ĉiaj religioj, ne, ĝi ĉirkaŭprenas ĉiujn."

Kaj, aliloke li skribas: "Samtempe mi ne faras sekreton ke, tutan mian vivon, mi tre ŝatas Vedanton. Mi plene povas konsenti kun Schopenhauer, kaj tute kompreni tion, kion li signifis, kiam li diris: 'En la tuta mondo ne estas elli, krom tiu de la originalo (de Upaniŝadoj) tiel helpanta, kiel tiu de la Upaniŝadoj mem. Ĝi estas la paco de mia vivo, ĝi estos la paco de mia morto.' Kaj mi nek timas, nek bedaŭras diri, ke mi partaĝas lian entuziasmon por Vedanto, kaj mi sentas, ke mi ŝuldas al ĝi pro multoj, kiuj helpis min en mia paco tra la vivo."

Mi finos tiujn ĉi malmultajn liniojn kun verso el Sanskrita preĝo, komune uzita inter Hindoj: "La universaj religioj de la mondo, ĉiuj elvenas el malsama vidpunkto, kaj ĉiuj demandas por si bonegecon kaj sanegecon, sed, kia ajn estu la vojo, rekte aŭ malrekte, oni iras laŭ sia ŝato. Vi, Ho Dio! estas ilia sola fino, kiel la oceano estas la sola fino de la riveroj." ANANDO.

Mi deziras preni la unuan okazon danki tiujn legantojn kiuj jam estas reabonintaj. Kaj mi esperas ke la ceteraj afable sendos senprokraste siajn reabonojn ĝis la fino de 1905, por ke la demando de la pligrandigo de la Gazeto povu decidiĝi.

Diversaj leteroj alvenis, enhavantaj utilajn proponojn. Tial, Aŭstralia amiko proponas ke ĉiuj verkantoj metu post siaj nomoj literojn, indikantaj la de ili komprenatajn lingvojn. Tiamaniere, "S<sup>ro</sup> Adamo Blanko, F.g.AGk." signifus ke li bone la Francan, iomete la Germanan, kaj bone la Antikvan Grekan lingvojn komprenas. Tio ĉi certe estus interesa, kaj kredeble estontaj verkantoj laŭe indikos siajn lingvajn povojn.

Abonanto el la Nordo skribas: "Permesu al mi gratuli vin, pro la disvastiĝo de la *Esperanta Gazeto*. Sur la Aŭgusta numero mi enmetis malgrandan anoncon inter la *Adresareto*. Mi jam estas ricevinta kvin respondojn el Belgujo, kvar el Francujo, du el Rusujo, kaj po unu el Bulgarujo, Hungarujo, Italujo, Hispanujo, kaj Maltujo. Estus interese ekscii, ĉu ekzistas alia gazeto en tiu ĉi lando eldonata, kiu estus alportinta tian agrablan rezultaton post elspezo de nur sepdek centimoj!"

Amerika Esperantisto skribas: "Eble estus saĝe poŝti vian ĵurnalon nefaldatan, sub granda kovrilo, kiel oni ofte faras en la Unuigitaj Ŝtatoj. Mi intencas bindigi miajn gazetojn, kaj la faldo igas malgrandan difekton." Eble kajeroj senditaj alilanden premiĝis pli ol la enlandaj numeroj. Sed ĉu tiu ĉi difekto ne malaperos post la bindigo? Malfeliĉe, oni ne povas uzi grandajn kovrilojn; pro la pezo; sed ĉiam, kiam du ekzempleroj estas senditaj, ili estas sendataj laŭ tuba formo.

Angla Abonanto deziras la forigon de la dulingvaj paĝoj, naive konfesante ke li estas "mallaborema." Kontraste, niaj energiaj alilandaj amikoj multe ŝatas la laŭvortajn tradukojn, kiuj helpas ilin ellerni la Anglan lingvon.

Kiel Esperanto helpas je la akiro de nia lingvo, tiel ĝi helpas je la internaciigo de ĉiunaciaj literaturaj juveloj; kaj ni tre kontente akceptas la novan tradukon de la mondfama *L'Avare*, de Molière, verkita de la klerega S<sup>ro</sup> Sam Meyer (kosto 9d.). Aliaj novaj tradukoj estas la *Eneido*, *Kantoj 1 & 2*, de D<sup>ro</sup> Vallienne (7d.) kaj *Cikado ĉe Formikoj* (Franca Komedio), de la studentoj en Chaumont, sub la estreco de S<sup>ro</sup> René Deshays (7d.).

Multaj legantoj atendas la aperon de *La Ventego* de Shakespere, tradukita de S<sup>ro</sup> Motteau. La verko estas inter la manoj de la presistoj, kaj kredeble eldoniĝos ĉirkaŭ la monatfino (kosto, 2f. 60, kun verda leda kovrilo kaj ilustraĵoj).

I wish to take the first opportunity to thank those readers who have already renewed their subscriptions. And I hope that the remainder will kindly send, without delay, theirs till the end of 1905, so that the question of the enlargement of the Gazette may be decided.

Various letters have come to hand, containing useful suggestions. Thus, an Australian friend proposes that all contributors should place after their names letters to indicate the languages they understand. So "Mr. Adam White, F.g.AGk." would signify that he was acquainted well with French, slightly with German, and thoroughly with Ancient Greek. This would certainly be interesting, and probably future contributors will thus indicate their linguistic attainments.

A Northern subscriber writes: "Allow me to congratulate you on the circulation of THE ESPERANTIST. In the August number I inserted a small advertisement in the *Adresareto*. I have already received five replies from Belgium, four from France, two from Russia, and one each from Bulgaria, Hungary, Italy, Spain, and Malta. It would be interesting to ascertain if another gazette published in this country exists which would have brought such a gratifying result after the expenditure of only sixpence!"

An American Esperantist writes: "It might be well to mail your journal unfolded, under a large cover, as is often done in the United States. I intend to bind my gazettes, and the folding causes a slight defect." Maybe, copies sent abroad have been more crushed than inland ones. But will not this defect disappear on binding? Unfortunately, we cannot use large envelopes on account of the weight; but always, when two copies have been ordered, they are sent in tube form.

An English subscriber wishes for the abolition of the bi-lingual pages, naively confessing that he is "lazy." On the other hand, our energetic foreign friends greatly appreciate the literal translations, which assist them to learn English.

As Esperanto helps in the acquirement of our language, so does it assist in the internationalisation of the literary gems of all nations; and we gladly welcome the new translation of Molière's world-famous *L'Avare*, by the most able M. Sam Meyer (price 9d.). Other new translations are the *Aeneid*, *Cantos 1 & 2*, by Dr. Vallienne (7d.), and *Cikado ĉe Formikoj* (a French comedy), by the students in Chaumont (Haute Marne), under the direction of M. René Deshays.

Many readers are awaiting the appearance of Shakespere's *Tempest*, translated by Mr. Motteau. The work is in the printer's hands, and should be published about the end of the month (cost, 2s. 1d., with green leather cover and illustrations).

## LA TREZORO EN LA ARBARO.

Dua rakonto de la klerega romanisto H. G. Wells, tradukita (laŭpermeso) de  
Marty<sup>n</sup> Westcott.

La kanuo<sup>1</sup> jam alproksimiĝis al la marbordo. La golfeto plilarĝiĝis, kaj interspaco en la blanka rifa ŝaŭmo signis la lokon kie la rivereto enfluas en la maron; la pli densa kaj malhela verdo de la virga arbaro montris ĝian fluejon de la malproksima deklivo monteta. Tie ĉi la arbaro atingis rekte ĝis la marbordo. Multe pli malproksime, dubelumaj kaj iom kvazaŭ nuboj laŭ apero, leviĝis la montoj, kiel ondoj subite malfluidiĝintaj. La maro estis trankvila, krom pro preskaŭ nevidebla marmovado. La ĉielo flamegis.

La homo kun la skulptita remileto haltis. "Ĝi devas esti ie apude," li diris. Li enkanuigis la remileton, kaj etendis rekte antaŭ si la brakojn.

La alia homo estis sur la antaŭparto de la kanuo, zorge rigardante la teron. Li tenis sur genuo flavan paperan folion.

"Venu, kaj rigardu tion ĉi, Evans," li diris.

La du homoj parolis mallaŭte, kaj iliaj lipoj estis malmolaj kaj sekaj. Tiu, nomata Evans, balancis sin laŭlonge la kanuo, ĝis kiam li povis rigardi ĝin trans la ŝultro de sia kunulo.

La papero ŝajnis esti kruda geografia karto. Pro ofta faldado, ĝi fariĝis tre ĉifita kaj eluzita preskaŭ ĝis pecetoj, kaj la dua homo kuntenis la makulitajn pecetojn tie, kie ili malkuniĝis. Sur ĝi oni malklare povis distingi, verkitan krajone kaj preskaŭ forfrotitan, la konturon de la golfo.

"Jen!" diris Evans, "estas la rifo, kaj jen la fendo." Li gvidis sian fingregan ungon sur la karto. "Tiu ĉi kurba kaj torda linio prezentas la rivereton—mi povus ja trinki nun!—kaj tiu ĉi steleto montras la lokon."

"Vi vidas tiun ĉi punktan linion," diris la homo kun la karto; "ĝi estas rekta linio, kaj ĝi kuras de la fendo de la rifo, ĝis tnfu da palmarboj. La steleto estas ĝuste tie, kie ĝi trafas la rivereton. Ni devas rimarki la lokon, kiam ni eniros en la lagunon."

"Estas malfacile kompreni tion," diris Evans, post paŭzo, "kion signifas tiuj ĉi streketoj malsupre. Ĝi ŝajnas esti la desegno de domo, aŭ de io simila; sed tion, kion signifas ĉiuj tiuj ĉi streketoj montrantaj tien ĉi kaj tien, mi ja neniel povas diveni. Kaj kia estas la skribaĵo?" "Ĥina," diris la homo kun la karto. "Kompreneble! Li estis Ĥino," diris Evans. "Ili ĉiuj estis Ĥinoj," diris la homo kun la karto.

Ili ambaŭ sidis kelkajn minutojn fikse rigardante la teron, dum la kanuo malrapide antaŭen flosadis. Tiam Evans ekrigardis la remileton.

"Jen via vico ĉe la remilo, Hooker," li diris.

Kaj lia kunulo kviete kunfaldis sian karton, enpoŝigis ĝin, zorge preterpasis Evans kaj ekremis. Liaj movadoj estis lacaj, kiel tiuj de la homo kies forto preskaŭ foriĝis.

Evans sidis, okuloj duone fermitaj, observante kiel la ŝaŭma ondrompilo de la koralo ŝajnas pli kaj pli alproksimiĝi. La ĉielo jam estis por ili, kiel brulanta fornego, ĉar la suno estis apud la zenito. Kvankam ili estis tiel proksime de la trezoro, li ne sentis la atenditan kontentegon. La ekscitego de la batiĝo por posedi la karton, kaj la longa nokta vojaĝo de la ĉeflando sur senproviza kanuo estis, kiel li diris, ellacigintaj lin. Li penadis sin eksciti, turnante siajn pensojn sur la orfandaĵoj, pri kiuj la Ĥinoj estis parolintaj, sed ili ne volus resti tie; ili revenis tuj al la ideo pri la dolĉa akvo murmuretante en la rivero, kaj al la preskaŭ neelportebla sekegeco de liaj lipoj kaj gorgo. La ritma plaŭdado de la maro sur la rifo nun aŭdetiĝis, kaj ĝi havis agrablan sonon por liaj oreloj; la akvo lekis la kanuflankon, kaj akveroj gutadis de la remileto inter ĉiu ekremo. Iom pli poste, li ekdormetis.

Li ankoraŭ estis malklare konscia pri la insulo, sed stranga revaĵo intermiksiĝis kun liaj sentadoj. Denove estas la punkto, kiam li kaj Hooker estas eltrovintaj la sekreton de la Ĥinoj; li vidas la lunlumigatajn arbojn, la malgrandan fajron bruletantan, kaj la nigrajn figurojn de la tri Ĥinoj—unuflanke argentatajn pro la lunlumo, kaj aliflanke ruĝajn pro la fajrlumo—kaj li aŭdas ilin interparoladi Piĝin-Angle<sup>2</sup>, ĉar ili estas venintaj el diversaj provincoj. Hooker, unua, ekkomprenas la temon de ilia parolado, kaj faras signon, ke li aŭskultu. Eroj el la interparolado estas neatdeblaj, kaj eroj nekompreneblaj.

Hispana galjeno<sup>3</sup> de la Filipinaj Insuloj, senespere surterkurinta, kaj ĝia trezoro enfosita ĝis la reveno-tago, estas la fundamento de la historio; ŝippeireiĝinta maristaro malmultigita per malsano aŭ per malpacoj kaj la postuloj de la disciplino, kaj, fine, la foriro per la boatoj, neniam plu retrovotaj. Tiam Ĉang Haj, nur unu jaro antaŭ, sur teron vaginte, hazarde eltrovis la orfandaĵojn dum ducent jaroj kaŝitajn. Li forkuras de sia ĵunko<sup>4</sup>, kaj reenterigas la oron per grandega laboro, senhelpe, sed laŭ tre ruza maniero. Li multe akcentegis la ruzecon—estis lia propra sekreto. Nun li bezonas helpon reveni por elfosi ilin. Post nelonge la karto flirtis teren, kaj la voĉoj silentiĝis. Kia bela rakonto por la oreloj de du Britaj sentaŭguloj!

La revo de Evans translokiĝis al la momento, kiam li tenis la harvoston de Ĉang Haj inter siaj manoj. La vivo de Ĥino estas apenaŭ de tia indo, kiel tiu de Eŭropano. La ruza vizaĝo de Ĉang Haj, unue, akra kaj furioza kiel tiu de ektimigita serpento, kaj poste terura, perfidema kaj kompaktinda, fariĝis multe tro vidata en la revo. Ĉe la fino, Ĉang Haj faras grimacon, grimacon plej nekompreneblan kaj timigeman. Subite aferoj tremalagrabliĝis, kiel iafoje okazas en la revoj kaj sonĝoj. Ĉang Haj babiladis kaj minacis lin. Li reve vidis grandajn amasojn da oro, kaj Ĉang Haj sin intermetantan kaj baraktantan reteni lin de ili. Li ekprenas Ĉang Haj per la harvosto—kiel la flava bruto estas granda, kiel li baraktadas kaj grimacas! Li plikreskadas ankaŭ. Tiam la brilaj oramasoj ŝanĝiĝis en brulegantan fornon, kaj vasta diablo, mirinde simile al Ĉang Haj, sed kun nigra vostego, eknutris lin per karbo. Ili terure brulvundis lian buŝon. Alia diablo elkriegis lian nomon: "Evans, Evans, dormema malsaĝulo!" aŭ ĉu li estis Hooker?

Li vekigis. Ili estis ĉe la eniro de la laguno.

"Jen la tri palmoj. Ĝi devas esti sur unu linio kun tiu arbetaro," diris lia kunulo. "Memoru tion! Se ni aliros ĝis tiuj arbetoj, kaj tiam vojiros en la arbetaĵon laŭ rekta linio de ĉi tie, ni ĝin atingos, kiam ni alvenos al la rivereto."

Ili nun povis vidi tie, kie la elfluo de la rivereto plilargiĝis. Je ĝia vido, Evans reviviĝis. "Rapidu, amiko," li diris, "alie, je la ĉielo, mi devos trinki marakvon!" Li mordetis sian manon, kaj rigardis la arĝentan streketon inter la ŝtonegoj kaj la verda densejo. Post iom da tempo, li preskaŭ furioze turniĝis al Hooker: "Donu al mi la remileton," li diris.

Tiel ili alvenis la elfluejon de la rivero. Iom pli antaŭen, Hooker prenis akvon en la mankavon, gustumis ĝin, kaj elkraĉis. Iom poste, li denove provis ĝin: "Tio ĉi taŭgos," li diris, kaj ili komencis avide trinki.

"Malbenu tion!" diris Evans, subite. "Estas

tro malrapide." Kaj, riske kliniĝinte trans la antaŭa parto de la kanuo, li komencis ensuĉi la akvon per la lipoj.

Baldaŭ ili faris finon de la trinkado kaj, naĝigante la kanuon en malgrandan golfeton, ili estis surteriĝontaj meze de la densa kreskajaro, kiu superpendis la akvon.

"Ni devos barakti tra tio ĉi ĝis la marobordo, por ke ni trovu niajn arbetaĵojn, kaj tiel la linion al la loko," diris Evans.

"Plibone estus, ke ni remu tien," diris Hooker.

Tial ili denove surriveriris kaj returnen remis al la maro, kaj laŭlonge de la bordo ĝis la loko, kie kreskis la arbetaro. Ĉi tie ili alteriĝis, tiris la malpezan kanuon alten sur la marbordo kaj tiam supreniris al la rando de la ĵunglo<sup>5</sup> ĝis kiam ili povis ekvidi la fendon de la rifo kaj la arbetaro sur rekta linio. Evans elprenis el la kanuo tieulan ilon, kiu havis formon de la litero L, la kruca parto armita de polurita ŝtono. Hooker kunportis la remileton. "Ĝi nun estas rekte laŭ tiu ĉi direkto," li diris; "ni devos trapuŝi tien, ĝis kiam ni trafos la rivereton. Tiam ni devos esplori."

Ili trapuŝis densan amason da kanoj, da larĝaj foliegoj, kaj da junaj arboj, kaj en la komenco ĝi estis tre laciga irado; sed tre baldaŭ la arboj, pligrandiĝis, kaj la tero sub ili plividiĝis.

La brilego de la suna lumo ŝanĝiĝis je nesente blaj gradoj, en malvarmetan ombbron. Fine la arboj fariĝis vastaj kolonoj, kiuj sin levis ĝis baldakono de verdaĵo alte superkape.

Malhelaj blankaj floroj pendis de siaj trunketoj, kaj rampetantaj kreskaĵoj kiel ŝnuroj svingis de arbo ĝis arbo. La ombro profundigis. Surtremakulataj fungegoj kaj ruĝbruna likeno oftigis.

(FINOTA.)

<sup>1</sup> Canoe; canot. <sup>2</sup> "Lingvofranca" de Komercestoj Ĥinaj. <sup>3</sup> Galleon; galion. <sup>4</sup> Junk; jonque. <sup>5</sup> Jungle; fourré.

## SURPRIZANTA!

Originala historio de la studentaj tagoj, de D<sup>ro</sup> Mayer (Manchester).

Antaŭ multe da jaroj mi estis studento en la Universitato de Vieno, kaj, post du jaroj, mi decidis reeniri en Germanujon por daŭrigi mian lernadon en Breslaŭo, la ĉefurbo de Silesio.

Estis belega tago kiam mi alvenis tie, kaj, esperante ke mi trovos grandan societon kune, mi direktis miajn paŝojn al la Pariza Ĝardeno, unu el la plej favorataj ĝardenoj Breslaŭaj.

Mia espero estis konfirmata.

Enirante, mi vidis grandan nombron da studentoj, kies kapoj estis kovrataj per multekolorataj ĉapetoj; ili sidis sub la arboj, kaj trinkis Bavaran bieron, kaj fumis longajn pipojn dum la muzikistoj ludis la Radetzkiian Marŝon.

Apenaŭ mi sidigis ĉe aparta tablo, kiam du studentoj alvenis al mi, kaj ni komencis interparoladon, kiu iĝis vivega post malmulte da minutoj.

La du sinjoroj penadis priskribi la ĉefajn trajtojn de Breslaŭo al mi, sed iliaj priskriboj estis tiel malsamaj, ke mi ne povis formi ian ideon pri ili.

S<sup>ro</sup> Ambrosio estis efektive optimisto, dum lia amiko S<sup>ro</sup> Nero ludis la kontraŭan parton. Nu, kia bono elvenis el ĉiuj tiuj ĉi kontraŭdiroj! Nenio, krom veto.

Dum la lastaj minutoj, la sinjoroj disputadis pri la valoro de la urba policaro, S<sup>ro</sup> Ambrosio absolute certigis, ke ĝi estas fama pro ĝia lerteco, ka.

S<sup>ro</sup> Nero diris, ke estas nenio pli malbona en la mondo.

La veto estis aranĝita tiamaniere :

S<sup>ro</sup> Ambrosio entreprenis esti arestata de policanoj en kvar semajnoj, sen farinte ion kontraŭ la leĝo. S<sup>ro</sup> Nero promesis senpune fari krimon sub la okuloj de la policanoj, kaj pretendis, ke tiuj ĉi eĉ helpos lin. Li farus tion ĉi ankaŭ en kvar semajnoj.

Oni elektis min esti juĝo por diri, je la fino de tiu ĉi tempo, kiu ludis sian rolon laŭ la plej bona maniero.

Sed kvar semajnoj estas longa tempo, kaj mi forĝesis la tutan aferon.

Okazis, ke mi estis ree vespere en la Pariza Ĝardeno, sidanta ĉe la sama tablo, kiam mi ekvidis miajn antaŭajn kunulojn alvenantaj al mi.

Jen estas tio kion ili rakontis al mi.

S<sup>ro</sup> Ambrosio estis peninta kvar semajnojn, per la helpo de sia dommastrino, havigi la plej difektajn vestojn de vagisto. Li surmetis ilin vespere kaj, post kiam la frizisto pentris lin tiel, ke neniu povos rekoni lin, li eliris sur la straton.

Li marŝis lametante, kaj zorge ĉirkaŭen rigardante. Tuj policano ekvidis lin, kaj sekvis de malproksime.

Fine S<sup>ro</sup> Ambrosio eniris en malgrandan drink-ejon, kaj postulis glason da ĝino.

La mastro, kiam li vidis la mienon de sia kliento diris, retirante la glason: "Sed ĉu vi havas monon?" S<sup>ro</sup> Ambrosio kvazaŭ timigata kurbigis, kaj prenis dudek kvin talerojn papermone el sia boto, kaj metis ilin zorge sur la tablon.

La policano staris ĉiam antaŭ la fenestro por vidi la finon de la dramo.

La mastro, ekprenante la bankan bileton, sen donante la glason da ĝino al S<sup>ro</sup> Ambrosio portis la monon al lumo, por vidi ĉu ĝi estas vera. Li demandis: "De kiu vi ricevis tiun ĉi bileton?"

"De mia patrino," respondis la vagisto.

Tiam eniris la policano.

"Ĉu via patrino loĝas malproksime?" li demandis.

"Jes, ĉirkaŭ kvar mil mejlojn."

"Bone, venu kun mi al la polica stacidomo, por ke mi certigu vian historion." Li tiam ekprenis lin per la brako, kaj kondukis lin eksteren, kie alia policano atendis.

Tiel S<sup>ro</sup> Ambrosio marŝis inter du policanoj laŭ la direkto al la polica stacidomo.

Nu, ekmallumiĝis kaj, kiam ili apudestis la *Hotel de Saxe*, ĉe la alia flanko de la strato ili subite ekvidis la estron da la urba policaro marŝantan laŭ kontraŭa direkto.

Li tordis siajn longajn lipharojn, kaj rigardis sovaĝe sur ili. La policanoj salutis, sed la estro transiris la straton.

"Kiun vi havas tie?" li demandis. "Suspektindan viron, kiu havis dudek kvin talerojn en sia boto, via moŝto." Je tiuj ĉi vortoj, la komandanto iĝis tre kolera, kaj li ekkriis: "Kaj vi ambaŭ forlasis vian postenon por aresti tiun ĉi malgrandan junulon, kiu ne faris ion malrajtan? Morgaŭ matene ĉe dek-tridek, mi ordonas vin ĉeesti mian oficejon. Nun, mi mem alkondukos tiun ĉi malliberulon al la stacidomo, kaj vi tuj iru al viaj postenoj."

Tion dirinte, li alvokis fiakron, per signo de mano ordonis la malliberulon eniri, kaj sekvis lin. Ili do ambaŭ rapide veturis ĝis la stacidomo, sed S<sup>ro</sup> Ambrosio multe miris kiam oni ne haltis antaŭ tiun konstruaĵon, sed li ne kuraĝis ion diri.

La fiakro ruliĝis en la plej aristokratan kvartalon de la urbo, kaj antaŭ belega palaco ĝi haltis.

La komandanto eliris, kaj ordonis al la vagisto, ke li sekvu lin en liajn privatajn ĉambrojn.

Ili ambaŭ eniris en la princaĵon salonon, kaj la oficisto, sidiginte ĵus kontraŭ la malliberulon, subite formetis siajn lipharojn kaj diris: "Ĉu vi konas min, Ambrosio? Certe mi deziregas scii tion, kion decidis nia amiko la juĝo pri niaj agoj!"

S<sup>ro</sup> Ambrosio mutiĝis pro mirego.

Tuj poste, la servistinoj envenis, kaj pretigis grandan te-tablon por ili.

Tion, kio poste okazis mi tute ne scias, sed la societo en la Pariza Ĝardeno iĝis tiel vivema, ke mi apenaŭ povis doni mian juĝon. Fine mi decidis jene:

S<sup>ro</sup> Ambrosio, estas vere, faris nenion malrajtan sed la aresto ne estis plenumita.

S<sup>ro</sup> Nero faris krimon, sed ne estis punita.

Mi do ordonis, ke S<sup>ro</sup> Ambrosio pagu la duonon, ĉar li ne estis arestita, kaj ke S<sup>ro</sup> Nero pagu la alian duonon, por kontentigi sian konsciencon.

Surprizante estis, ke ni tri okaze renkontiĝis, lastan someron en Parizo, S<sup>ro</sup> Ambrosio estas nun profesoro, S<sup>ro</sup> Nero ambasadoro, kaj mi estas la viro, kiu rakontas tiun ĉi historion al vi.

### MEDITADOJ EN WESTMINSTER ABBEY.

El "The Spectator," Marto 30, 1711, verkita de Addison. Tradukita de Rev. N.B.

Kiam mi estas en serioza humoro, tre ofte mi sole promenas en Westminstera Abatejo; kie la mallumeco de la loko, kaj ĝia uzado, kune kun la soleneco de la konstruaĵo, kaj la stato de la homoj, kiuj en ĝi kuŝas, emas pleniĝi la spiriton je speco

da melankolio, aŭ plivole pripenseco, kiu ne estas malagraba. Hieraŭ mi restis tutan posttagmezon en la preĝejkorto, la kloitroj, kaj la preĝejo, min amuzante per la tombŝtonoj, kaj la surskriboj, kiujn mi vidis en tiuj diversaj regionoj de la

mortintoj. El ili, la plej granda nombro raportis nenion pri la enteriĝinto, krom ke li naskiĝas unu tagon, kaj alian tagon mortas: la tuta historio de lia vivo enhavata en tiuj ĉi du cirkonstancoj, kiuj estas al ĉiuj komunaj.

Mi ne povis ne rigardi tiujn ĉi registrojn de ekzistaĵo, flavkuprajn aŭ marmorajn, kiel speco da satiro sur la mortintoj, kiuj estis lasintaj nenian alian memoraĵon pri si, krom ke ili naskiĝis, kaj ke ili mortis. Ili min memorigis pri multaj homoj citatoj en la bataloj el heroaj poemoj, kiuj estas sonore nomataj nur por ke ili mortiĝus, kaj kiuj nur estas famaj pro frapoj sur kapojn.

Γλαῦκόν τε, Μεδόντα τε, Θερσίλοχον τε.

La vivo de tiuj ĉi viroj bone priskribiĝis en la Sankta Skribo per "La vojeto de sago," kiu tuj fermiĝas kaj perdiĝas.

Kiam mi eniris en la preĝejon, mi amuzis min per la fosado de tomo; kaj mi vidis en ĉiu ŝovelaĵo suprenĵetita, la peceton de osto aŭ kranio intermiksitan kun freŝe ŝimigiĝanta tero, kiu iam havis lokon en la kumeto de homa korpo. Tiam mi komencis pripensi, kiaj nekalkuleblaj aroj da homoj kuŝis kunkonfuzitaj sub la pavimo de tiu antikva katedro; kiel viroj kaj virinoj, amikoj kaj malamikoj, pastroj kaj soldatoj, monaĥoj kaj kanonikoj estis kunelfalataj, kaj kunmiksita en la sama komuna amaso; kiel beleco, forteco, kaj juneco kune kun maljuneco, malforteĉo kaj malbelformeĉo kuŝis nedistingataj en la sama konfuza amaso da materialo.

Tiel elvidinte tiun ĉi grandan magazeton de la morto, kvazaŭ entute, mi ĝin pli aparte ek esploris per la rakontoj, kiujn mi trovis sur multaj monumentoj, levigitaj en ĉiu kvartolo de tiu antikva konstruaĵo.

Kelkaj el ili kovriĝis per tiaj malŝparemaj epitaĵoj, ke, se la mortinto povus konatiĝi kun ili, li ruĝiĝus pro la laŭdoj aldonitaj al si de siaj amikoj.

Estas aliaj, tiel troe modestaj, ke ili priskribas la karakteron de la mortinto Greke aŭ Hebrece kaj pro tio, ili ne estas komprenataj unufoje dum unu jaro.

En la *Kojno de la Poetoj* mi trovis, ke estas poetoj sen monumentoj, kaj monumentoj sen poetoj.

Mi ja vidis, ke la nuna militado estas pleninginta la preĝejon per multe da tiuj ĉi senhomaj monumentoj, kiu estas starigitaj al la memoro de personoj, kies korpoj eble enteriĝis sur la ebenaĵoj de Blenheim, aŭ en la bruston de la oceano.

Mi ne povis ne esti multege ravita de multaj modernaj epitaĵoj, kiuj estas verkitaj kun granda eleganteco de esprimo kaj ĝusteco de penso, kiuj do tiel honoras la vivantojn, kiel la mortintojn. Pri tio, ke alilandano estas tre ema eltiri ideon pri

la nescio aŭ la ĝentileco de ia nacio el la maniero de ĝiaj publikaj monumentoj kaj surskriboj, tiuj ĉi devus submetiĝi al la legado de kleruloj kaj geniuloj, antaŭ ol ili estos gravurataj. La monumento de Sir Cloudesley Shovel tre ofte min multe ofendis; anstataŭ la brava Angla admiralo, kiu estis la distingiga karaktero de tiu malbela sinjoro, li sur sia tomo reprezentigas per la figuro de koketulo vestita de longa peruko, kaj sin ripozanta sur veluraj kusenoj sub parada baldakeno. La surskribo respondas al la monumento ĉar, anstataŭ ol glorigi la multajn rimarkindajn heroaĵojn, kiujn li por sia patrujo farinta estis, ĝi nur nun sciigas pri la maniero de lia morto, pro kio li povis rikolti nenian honoron.

La Holandanoj, kiujn ni estas emaj malestiminti pro manko da genio, montras senlime pli veran guston pri la antikveco kaj la ĝentileco, per siaj konstruaĵoj kaj tiaj laboraĵoj, ol tiuj, kiujn ni trovas en nia propra lando. La monumento de iliaj admiraloj, kiuj konstruiĝis je la ŝtata elspezo, reprezentas ilin laŭ iliaj veraj similoj, kaj ili ornamigas per maraj kronoj kaj ŝipaj ornamoj, per belaj festonoj el markreskaĵo, konkvoj kaj koralo.

Sed ni revenu al nia temo.

Mi estas lasinta la tenejon de niaj Anglaj reĝoj por rigardi alian tagon, kiam mi trovos mian spiriton inklina al tia serioza amuzado. Mi scias, ke tiaj konsideroj ĝenerale ekscitas mallumajn kaj funebrajn pensojn ĉe la timemaj spiritoj kaj malĝojaj fantazioj; sed, por mi mem, kvankam mi ĉiam estas serioza, mi ne scias tion, kio estas melankoliigi; kaj mi do povas rigardi la Naturon, en ŝiaj profundaj kaj solenaj scenejoj kun la sama plezuro kiel en ŝiaj plej gajaj kaj ravaj modoj. Tiel mi povas plibonigi min per tiuj aferoj, pri kiuj aliaj terure pripensas. Kiam mi rigardas la monumentojn de la potenculoj, ĉia envia kortuŝeco en mi mortas; kiam mi legas la epitaĵojn de la belaj, ĉia malmodera deziro malaperas; kiam mi renkontas la doloron de gepatroj sur tombŝtonomia koro komplete moligita; kiam mi vidas la tombon de la gepatroj mem, mi pripensas pri la senutileco ploregi tiujn, kiujn ni post mallonga tempo devos sekvi; kiam mi vidas reĝojn kuŝantajn apud tiuj, kiuj detronis ilin; kiam mi konsideras konkurantajn spiritulojn flanke ĉe flanke metitajn; aŭ sanktulojn, kiuj dividigis la mondon per siaj argumentoj kaj disputadoj, mi malĝoje kaj mire pripensas pri la malgrandaj konkursetoj, sektetoj kaj disputetoj de la homaro.

Kiam mi legas la diversajn datojn sur la tomboj de unuj, kiuj hieraŭ kaj de unuj, kiuj antaŭ sescent jaroj mortis, mi pripensas pri Tiu Granda Tago, kiam ni ĉiuj estos samtempuloj, kaj kune aperos.



## THE PROGRESS OF ESPERANTO IN GREAT BRITAIN AND ABROAD.

*The contents of this section are supplied by the Hon. Sec. of the London Esperanto Club, who invites all Esperantists to send monthly reports of the spread of the International Language in their districts. Communications must reach 14, Norfolk Street, London, W.C., before the 8th of each month.*

On Friday, October 14th, the unification of organised effort for the propagation of Esperanto within the British Empire was accomplished by the formation of The British Esperanto Association. This took place at a meeting of representatives of many of the twenty-five British Societies, and individual Esperantists of both sexes, held in the Essex Hall, Strand.

Our space does not admit of a verbatim report of the speeches, which can only be given in condensed form.

On the motion of Mr. J. Rhodes (Keighley), seconded by Mr. C. E. Cowper (Deal), Mr. W. T. Stead was called to the chair.

The chairman said the business of the evening was not to discuss the merits or demerits of Esperanto. They were met as a company of men and women who had come to the conclusion that Esperanto was the best thing going in the way of a key-language, and that it was their duty to decide how best to join their forces so as to make the best thing within sight available to the greatest number of people in the shortest possible time (hear, hear).

When the movement began to spread it developed one or two features which he thought were rather hopeful. Persons with enterprise began here and there to see that if Esperanto was going to go, there was money in Esperanto. He had a great belief in things that had money in them (hear, hear). For this reason, that any good cause which would pay a 5 per cent. dividend would multiply and increase itself just as a tree would multiply itself by throwing off its seed; but any philanthropic or other public-spirited association which would pay no penny in dividend was like a telegraph pole set in the ground—it would stand until it rotted, but it would never breed another telegraph pole. So it was in relation to societies that were purely benevolent. But perhaps that was too bad to be suggested of this new organisation, which was to be a purely propagandis-association. He should look upon it as representing what he might call the "Church" of Esperanto. He hoped there might be a profitable and revenue-producing "State" of Esperanto growing up outside with which their organisation would be in the closest possible manner associated, and while their business would be to preach the pure gospel of the cause, the other fellows would come along

and gather up the shekels. As for themselves, they only wanted sufficient of the shekels to keep the matter going.

A committee had been sitting for some time considering about the formation of a National Association, and among the suggestions framed was one as to title. Scarcely a month passed but some irate Scotaman wrote to say he was a most dastardly person for not having taken note that there were others beside English in the United Kingdom. Then the Americans would not have the word "British" at all; while as to the formula "English-speaking," the title "English-Speaking Esperanto Association" would look rather foolish, seeing that the object was speaking, not English, but Esperanto. It had, therefore, been finally decided, after a good deal of discussion, that, subject to the approval of that meeting, the title dividing them the least, and which would be the simplest, was The British Esperanto Association.

The suggestions, copies of which would be found on the chairs, had been drawn up by the London Group, and submitted to the rest as a basis for a provisional organisation until next May. Their purport had practically been embodied in a number of Resolutions now to be laid before the meeting.

He concluded by moving the first Resolution: That a society, to be entitled "THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION," be and is hereby formed. Mr. Geddes (Dover) seconded.

A discussion followed, Mr. A. E. Wackrill (late of Ceylon) suggesting a difficulty as to the equivalent in Esperanto of "Association," and pointing out the desirability of having the same initials for the title in both languages. It was replied that the word "Asociacio" (shortened in the newer *Esperanto-German Dictionary* into "Asocio") was already available. Finally, after Mr. Parsons (Battersea) had failed to find a seconder for his amendment—"The Esperanto Society of Great Britain and Ireland"—the Resolution moved from the chair was adopted unanimously.

*Resolution 2.*

Moved by Mr. Ledger (London); seconded by Mr. Gill (Acton). The objects of the Association shall be:—To promote in every way the spread of the auxiliary International language "Esperanto" by the formation of new local societies. By appointing representatives. Appointing delegates

for International conferences. The arrangement of congresses. Distributing information throughout the Empire. Arranging for the loan of collections of literature, correspondence, etc. The making arrangements for lectures. The publishing and distribution of books and propaganda literature. The organising of examinations and granting certificates of proficiency, etc., etc.

*Resolution 3.*

Moved by Mr. Cowper (Deal); seconded by Mr. Hayes (London). That the following gentlemen be elected to hold office until the annual meeting in May, 1905:—Honorary President—Dr. Zamenhof. President—Lieut.-Col. Pollen, LL.D. Vice-Presidents—Messrs. Joseph Rhodes, F.J.I., J. C. O'Connor, B.A., Felix Moscheles, W. T. Stead. Hon. Treasurer—Mr. W. Whitebrook. Hon. Secretary—Mr. H. Clegg. Hon. Auditors—Messrs. Schultz, Comins & Co.

*Resolution 4.*

Moved by Mr. T. Hoskison (Leeds); seconded by Mr. Finez (Dover). That a provisional Council be formed, consisting of one representative of each existing British group, with power to add to the number, such Council to hold office until May, 1905, when the first annual meeting shall be held and a new Council elected.

Councillors.—Aberdeen, Mr. Christen; Acton, Mr. Gill; Battersea, Mr. Leo; Bedford, Mr. Dudeney; Bournemouth, Mr. Woodward; Brighton, Miss Oxenford; Brixton, Mr. Eagle; Corbridge, Miss Bickell; Dover, Mr. Geddes; Dublin, Mr. Fournier; Edinburgh, Prof. Sarolea; Forest Gate, Mr. Carter; Glasgow, Mr. Wallace; Ilford, Mr. Jeffery; Keighley, Mr. Rhodes; Kensington, Mr. Maitland; Leeds, Mr. Wyms; Leicester, Mr. Mugglestone; Liverpool, Dr. Lloyd; London, Miss Lawrence; Newcastle, Mr. Mills; Plymouth, Mr. Thill; Portsmouth, Dr. Greenwood; St. Andrews, Mr. Haxton; Tynemouth, Mr. Davidson.

*Resolution 5.*

Moved by Mr. Joseph Rhodes (Keighley); seconded by Dr. Lloyd (Liverpool). That the Association shall consist of Fellows, Members, and Associates.

An annual subscription (the amount of which shall be determined by the Rules) shall be payable by each Fellow and Member respectively. These subscriptions shall be 5s. for Fellows, and 2s. 6d. for Members for the period up to the annual meeting in May, 1905.

Individual Members of all Associated Groups shall be, *ipso facto*, Associates, but without the right of voting (except through their Group Leaders).

The Rules shall provide for the election by the Council, from time to time, of Honorary Members, consisting of friends and helpers of the cause.

*Resolution 6.*

Moved by Mr. Cowper (Deal); seconded by Mr. O'Connor (London). The amount of annual subscription for affiliated Groups, based upon the effective numerical strength of each Group, shall be determined by the Rules; but the amount of subscription payable for the period up to the annual meeting in May, 1905, shall be 3d. per head.

*Resolution 7.*

Moved by Mr. Reeve (London); seconded by Mr. Millidge (London). That the Council be empowered to prepare a draft set of Rules for the Association, to be submitted to the first general meeting.

*Resolution 8.*

Moved by Mr. O'Connor (London); seconded by Miss Lawrence (London). That the Council be authorised to hire, as soon as possible, a room for one year, with the approval of the Guarantor; and to engage a paid assistant secretary for the period up to the annual meeting in May, 1905.

*Resolution 9.*

Moved by Mr. Farnes (London); seconded by Miss Schafer (London). That the honorary secretary be authorised at the conclusion of this meeting to enroll members on payment of the provisional subscription of 2s. 6d., and to receive donations, and that the Council be empowered to elect from amongst the members, before the annual meeting in May, 1905, a limited number of Fellows who have proved themselves to be expert Esperantists, and are willing to pay 5s.

For convenience sake these resolutions have been set down in the fashion in which they were finally settled, but no single resolution was passed without comment or discussion, although to most of them unanimous consent was finally given; for example, there was an amendment to Resolution 2, Mr. E. W. Eagle (Brixton) moving that the objects should be as in the printed paper, that is, in the sentence "distributing information throughout the Empire," "Empire" should be omitted. This was seconded by Mr. E. W. Bullen (Dulwich). Mr. J. C. O'Connor (London) pleaded for the larger idea, and pointed out that he had recently received applications for information as to how to start Groups from persons in Adelaide, Melbourne, Sidney, and another distant part of the Empire. The chairman suggested that, even if the words were left out, there would really be no limitation of the activities of the Association to that part of

the Empire contained within the British Isles. The meeting thereupon accepted the amendment unanimously, and the words stand simply "Distributing Information." Sir William Ramsay had been requested to become president, but, his absence in America making it possible that a reply would scarcely reach London before the meeting, the noted scholar and ardent Esperantist, Colonel Pollen, had consented to come to our help if needed. Sir William's telegram arrived just before the meeting, the letter not until later. With his usual kindness he wrote:—

R.M.S. *Baltic*, 13th October, 1904.

I am most flattered by your request. My position is simply this:—I am on the Council of so many Societies (and on the Senate of London University, too) that I find I have not sufficient time for what is really the business of my life, research. It is true that each Society takes only a little time, say, one afternoon a fortnight, some more; but in the aggregate they take far more time than I ought to give. I am now free from the presidentship of the Society of Chemical Industry; but I must still attend its meetings, for the new president is an American, and cannot be present in London.

These considerations lead me to decline your flattering offer. Believe me it is not want of will; but I have made up my mind not to undertake any more work of the kind for some years. I *must* have time for my own work, and the only way to secure it is to decline all public offices.

Remember that I am in complete sympathy with your movement.

Yours faithfully,

WILLIAM RAMSAY.

Thus far our efforts have been successful, and the B.E.A. formed, but we must not forget that this is only the first step, we have to formulate carefully the Rules; and suggestions of all kinds will be welcome. The arrangement as to examiners and examinations will be an arduous and difficult work, and this applies to the whole of the objects mentioned in Resolution 2. Each and everyone of us must do our very best to give of our time and of our means. It has often been said that true enthusiasm empties pockets. Let us, everyone who can afford it, at least, become members, and those who can go one better may add a donation. Subscriptions and funds will be gladly welcomed by the Hon. Secretary, Harald Clegg, Esq., 14, Norfolk Street, Strand, London.

Our space will not allow me to mention the classes in and around London; particulars of these

were published in the October *ESPERANTIST*. There was, however, one mistake, Miss Schafer's class at the German Club, Charlotte Street, Fitzroy Square, is held on Wednesday. The Principal of the Cusack Institute, White Street, close to Moor-gate Street Station, has placed a room at our disposal, and classes are held there on Thursday evenings—beginners at 6.15, teacher Mr. Gray; advanced 7.15, Miss Schafer.

Which of our readers has not heard of the extraordinary progress made by Esperanto in Aberdeen? Their case is, I should think, unique. As the result of a newspaper propaganda, commenced scarcely five weeks ago, Aberdeen has more than 170 students attending classes. They intend to hold a meeting in the Town Hall, which holds 5,000 people, and already names for the Adresaro are coming in. All honour to the enthusiastic Mr. A. Christen, who has originated and carried out this successful movement.

News of progress abroad will have to be held over this month. Two items are of great importance. At a congress of workmen painters held lately in Grenoble it was decided that delegates to the next congress must be able to speak Esperanto; and the preparations for the reception of Dr. Zamenhof at Boulogne are already being commenced.

---

*Tutmonda Jarlibro.*

As all our readers know, this wonderful directory has been compiled by S<sup>o</sup> de Ménil, of 45, Boulevard Magenta, Paris. It being the first of its kind, absolute correctness was impossible. All Esperantists are, therefore, earnestly asked to correct any mistakes they find in it, and to forward such corrections to S<sup>o</sup> de Ménil before the 10th November. Postcards will do of course; but if we are to have a correct directory next year everyone *must* help, and that speedily. We have already notified M. de Ménil of most obvious slips.

---

Mr. H. P. Hughes, of 2, Fairfield Road, Stockton Heath, Warrington, will send reprints of his interesting article (which appeared in several papers) to any who will send a stamped addressed envelope, and Mr. Dudeney's article in the *Bedfordshire Times* is still obtainable, price 2d.

---

We learn with great pleasure that our able friend Mr. Motteau holds, by request of Dr. Stanton Coit, a weekly class (on Mondays at 7.30) at the Union of Ethical Societies, 19, Buckingham Street, Strand, W.C.

## CORRESPONDENCE NOTES.

*El Rusujo.*—Mi ĵus revenis de mia longa Esperantista vojaĝo. Plej diverslandajn Esperantistojn renkontis mi: Hungarajn, Germanajn, Bohemajn, Francajn, Rusajn, Italajn—ĉiujn mi same bone komprenis, kun ĉiuj mi min sentis internaciulo, homo, Esperantisto! Mi konvinkis min, ke Esperanto estas parolebla de ĉiuj Eŭropaj, popoloj, kaj vidis, ke nenio povos haltigi la fortan fluon de tiu ĉi progresajo.—Via, G. KOLOWRAT, en *St. Peterburgo*.

*Pri la prefikso MAL.*—Ĉiuj Esperantistoj konsentas, ke ni ne devas uzi la prefikson MAL, kiam la logiko enkondukus uzon de SEN aŭ NE. La prefikso MAL montras la kontraŭecon. *La du ideoj estas kontraŭaj, nur kiam ilia sumo faras nulon.* Eble oni ridetos tiun algebran difinon. Tamen mi kredas, ke oni povas eltiri el ĝi, en la plimulto da okazoj, limon inter la uzo de MAL, kaj tiu de SEN aŭ NE. Ekz.:

Se ni varmigas ian mason da akvo, kaj malvarmigis, laŭ la sama grado, egalan mason, sufiĉos miksi ilin, por havi nenion faritan.

Puŝite egale kaj samtempe dekstren kaj maldekstren, oni ne moviĝas. Persono kiu logas nin pro siaj bonaj kvalitoj, kaj mallogas pro la malbonaj, sume lasas nin indiferantaj. Grasa makulo sur papero, lumigita de poste, aperas brila; de antaŭe lumigita, ĝi estas malbrila; lumigita egale ĉe ĉiu flanko, ĝi malaperas. Kunigante homon fortikan kun alia malfortika, oni povus akiri la saman laboron, kiel per du homoj senigitaj de tiuj du ecoj.

Generale, la estaĵoj kaj aferoj posedas kvalitojn aŭ proprajojn, kiujn ni kutimas vidi kunestantaj laŭ ia grado. Tio estas la komuna nivelo. Se radiko sciigas, ke ia proprajo superas ĉi tiun nivelon, la sama radiko kun MAL montras la saman proprajon laŭ malsupera grado. Sed kiam ni intencas celi la foreston aŭ neeston de proprajo ni uzu SEN aŭ NE. Ekz.:

La morto estas nur la senigo de la vivo; kaj la vivo neniam malon havas. (La morto havas unu, la naskigon; ĉar en urbo, kie la nombro de la naskigoj egalas tiun de la malnaskigoj, la kvanto da loĝantoj ne ŝanĝiĝas.) Do, vortoj kiel *malviva, malakra, malrekta, malcentra, malebla, malesti*, nenion signifas, se oni donas al la prefikso MAL ĝian veran sencon.

Nun, ĉu ekzistas ia diferenco inter SEN kaj NE? Eble pli bone estis uzi SEN kiam la proprajo celata okaze forestas, kaj NE kiam ĝi tute neestis. Senviva korpo; neviva ŝtono.

Sed mi konfesas, ke ĉi tio estas nur bagatelo.—H. SENTIS, *Grenoble*.

P.S.—En Jan., 1903, mi sendis artikolon pri tiu temo al la malaperinta R.I. (H.S.).

*Atesto pri facileco* (se oni bezonas plu!).—Mi estis aŭdinta pri Esperanto, sed mi sciis nenion pri ĝi antaŭ *gestera* (hieraaŭ) vespero, kiam amiko sendis al mi leteron skribitan en Esperanto. Post tri kvaronoj da horo, *per la helpo de unu kopio (kajero) de THE ESPERANTIST*, kiun mi ricevis kune kun mia letero, mi povis skribi Esperantan respondon! Post vespermanĝo tre horojn da nokto mi laboris (studis) pri la paĝoj de la Gazeto. Nun, morgaŭe, mi estas leginta granda(n) parto(n) de la Gazeto, kaj mi povas kompreni la vortojn preskaŭ tutajn, kvankam mi havas nek vortaron nek gramatikon, ekceptinte THE ESPERANTIST. Esperanto ja estas mirindega lingvo. La alia lingvo internacia, la malnova *Volapük* ne povis kompariĝi kun tiu ĉi. Ju pli mi vidas pri ĝi, des pli korege mi ŝatas ĝin. Volu pardoni min, se mia letero enhavas kelkajn erorojn kaj kredu ke mi estas, via tre vere, N.L.H. en Calcutta, Hindujo.

(A letter composed after but four hours' study, without dictionary or grammar, other than THE ESPERANTIST! What can be more convincing? The italics are ours.—EDITOR).

Referring to your notes in a recent number of THE ESPERANTIST, I believe that the best way of spreading a knowledge of Esperanto is for the London Chamber of Commerce to demand from every candidate for their certificate a competent knowledge of the language—that they should be at least able to read and write Esperanto; later on, candidates might be required to speak the language.

This suggestion would be somewhat unreasonable if learning to read and write Esperanto involved much labour; but I am surely overrating the difficulty when I assert that any boy of average ability would be able to conquer it by devoting one hour a week to it during our academical term of three months. A slow boy might require two terms, but slow boys are not wanted in the City or elsewhere.

English people are so abominably shy of any new proposal, especially when it is one of a promising nature, that I shall not be at all surprised if you continue to cry in the wilderness for many a year to come. You will probably have to wait until the International language has been adopted as the language of Commerce by every nation except ours.—Yours faithfully,

TEMPLE ORME.

## K R A N I O J .

Originale verkita de D<sup>ro</sup> A.M., No. 8720 (Trinidad).

La celo de ĉiu Esperantisto estas, aŭ devus esti, la forigo de naciaj antaŭjuĝoj, kaj li devus uzi ĉiujn batalilojn por efektivigi ĝin. Unu el tiuj ĉi bataliloj estas Antropologio. La konatiĝo kun la principoj de tiu ĉi scienco montras nin, ke la diversaj Eŭropaj nacioj estas ja apudaj parencoj, kaj ke la tiel nomataj naciaj malamikaĵoj estas pli ol malbonaj. Kio estas tiuj ĉi malamikaĵoj, krom heredaĵoj de la estinteco, nutritaj de egoistaj regnestroj, kaj nuntempe, ni ĝin diras honte, de la malveroj de egale egoistaj historiaj skribantoj.

Por la nemetiisto, mi diru, ke la antropologiisto estas la naturisto de la homo, kiu fondas siajn konkludojn sur la mezuroj kaj sur la fizikaj trajtoj karakteraj de la vivantoj, kaj ankaŭ de la mortintoj, sur la korpoj de la vivantoj aŭ de la mortintoj, sed, kutime, sur la skeletoj de la mortintoj, kaj ne, kiel la historiaj skribantoj, sur la priskribaĵoj de la malnovaj Grekaj kaj Latinaj aŭtoroj.

La plej gravaj mezuroj estas tiuj de la kranio.

La kranioj dividiĝas en tri klasojn, laŭ la proporcio de la larĝeco je la longeco; tiu ĉi proporcio, donita kiel procento da la longeco, estas nomata "cefalika indikilo."

La larĝeco estas mezurata ĵus super la oreloj, kaj la longeco de punkto inter la brovoj ĝis la okcipita ŝvelaĵo. La proporcio de la *longa kapo* (dolicocefaliko) estas malpli ol 75%, de la *meza kapo* (mezocefaliko) de 75% ĝis 80%, kaj la *larĝa kapo* (brakicefaliko) pli ol 80%.

La jena priskribo ne enhavas Rusujon, Finlandon, Laplandon aŭ Hungarujon, ĉar, rilate al iliaj loĝantoj, ili apartenas Azion; eĉ Rusujo havas tre malgrandan nombron da Eŭropsangaj homoj.

La plej unue konata Eŭropa homo estis longa kapulo, mallonga kaj bruneta, posedanta multe da Afrikaj trajtoj. Multaj antropologiistoj kredas, ke li originale venis el Afriko. Estas strange, ke la Afrikanoj havas tradicion laŭ kiu, la unuaj homoj estas nigraj. Unutage iu el ili, baninte sin en lago, blankiĝis! Kompreneble ĉiu rapidis sin bani en la sama lago, kies akvo pli kaj pli nigriĝis pro tio. La banantoj do fariĝis malpli kaj malpli blankaj, fine, la akvo tute perdis sian virton. La malŝeluloj, kiuj alvenis tro malfrue, estas la praavoj de la nunaj nigruloj, kaj la aliaj, pli malpli kolorataj, tiuj de la diversaj koloritaj rasoj.

Poste, raso da larĝakapuloj el la Oriento, pli altaj, pri fortaj kaj pli civilizataj ol la longakapuloj, okupis mezan Eŭropon, forpelinte la longakapulojn al Sudo, Nordo kaj Nord-Okcidento. La nunaj

Eŭropaj nacioj estas la posteuloj de tiuj ĉi du rasoj.

Por la ordigo, la antropologiistoj supozas, ke estas tri ĉefaj, puraj rasoj en Eŭropo, krom Rusujo, Finlando, Laplando, kaj Hungarujo.

(a). La Teŭtonoj, altaj kaj blondaj, kiuj havas longajn kapojn kaj vizaĝojn, kaj loĝas Skandinavujon kaj nordan Germanujon, estas la posteuloj de tiu parto de la originalaj longakapuloj, kiuj forkuris al la norda for de la larĝakapuloj.

(b). La Mediteraneuloj (Iberioj), malaltaj kaj brunetaj, kiuj havas ankaŭ longajn kapojn kaj vizaĝojn, kaj kiuj okupas la Britajn Insulojn, okcidentan Francujon, Hispanujon kaj la tutan bordon de la Mediteranea maro, estas la posteuloj de la restantaj originalaj longakapuloj.

La diferencaj karakteroj fizikaj de la du rasoj estas racionale klarigitaj per klimataj kondiĉoj. Ni ŝuldas al la Iberioj la civilizadon de antikva Egiptujo, Grekujo kaj Romo, sencitante tiun de Persujo kaj eble tiujn de la Semitaj Imperioj, ĉar estas preskaŭ certe, ke tiuj ĉi ankaŭ apartenis al la Mediteranea raso.

(c). La Keltoj, mezaltaj kaj brunetaj, kiuj havis larĝajn kapojn kaj vizaĝojn kaj loĝis mezan Eŭropon (mezan Francujon, sudan Germanujon, Aŭstrujon, Bohemujon, Polujon, kaj aliajn).

La Slavoj apartenas al tiu ĉi raso, kiu estis la posteulo de tiu originala raso, kiu forpelis la longakapulojn.

Senprecize, la fizikaj karakteroj de la tri rasoj troviĝas en la citataj landoj, sed estas esceptaĵoj. Ekzemple:—Forta larĝkapa elemento troviĝas en iaj partoj de Danujo. Ankaŭ la Baskoj (Basques) prezentas alian escepton, ĉar ili posedas larĝajn kapojn kaj longajn vizaĝojn. Kontraŭe apud la rivero Dordonjo (Dordogne) oni trovas longajn kapojn sed larĝajn vizaĝojn.

Kompreneble estas pli kumune trovi mezocefalikaĵojn kapojn ĉie, pro la intima miksaĵo de la tri rasoj. Se la leganto kalkulos la nombron de praavoj, kiujn li posedas dum du mil jaroj, li vidos, ke tio ĉi nur estas natura, ĉar liaj propraj praavoj estos pli multenombraj ol la tiama tuta loĝantaro de Eŭropo.

Hodiaŭ ne ekzistas tia estaĵo, kia Teŭtono, Kelto aŭ Mediteraneo.

Kelkaj vortoj estas necesaj pri la termino Kelta. La Kelto de la antropologiisto estas la larĝa kapo de meza Eŭropo, sed la "Kelto" de la historiaj verkantoj diversas, laŭ la fantazio de la aŭtoro.

Nuntempe la Francoj, Kimroj, Skotoj, kaj Irlandoj ĝuas la titolon. El tiuj ĉi, nur malgranda parto da Francujo povas prave uzi la nomon, la aliaj estas tielnomitaj, ĉar ili okazas paroli Keltajn dialektojn.

La malĝusta uzado de tiu ĉi vorto ĉe la aŭtoroj kaj la politikistoj pligrandigis multege naciajn malamikaĵojn inter la Angloj kaj Irlandoj, kaj ankaŭ inter la Francoj kaj la Germanoj.

Kvankam la Germanoj estas tiel multe aŭ pli Keltaj ol la Francoj, tamen tutaj libroroj estas skribintaj de Germanoj kontraŭ la Kelta Franco, kalumniante lin pro lia raso. Mommsen, rilate al tio ĉi, estas malglore la plej granda ofendanto el ĉiuj; tamen lia kapo estis klare Kelta. Malfeliĉa fakto—por tiuj ĉi Germanaj aŭtoroj—estas, ke multaj el la plej famaj Germanoj havis la larĝan

Keltan kapon, inter ili, Goethe, Schiller, Bismarck kaj eĉ Martin Luther!

Ĉu la ironio povus plimulton fari?

La nescianta Angla malestimo por la Irlandoj estas eĉ pli malbona ol la Germana malestimo de la Francoj, ĉar la Kelta elemento ĉe la Irlandoj estas tre malgranda kaj tiel intime intermiksita kun la aliaj, ke ĝi ne estas videbla. Kontraŭe, en la orienta parto de Anglujo, kie la Danoj loĝigis, la Kelta elemento estas tre ofte trovata.

La "Kelta" montano ankaŭ ŝuldas sian ekziston al la fantazio de la aŭtoroj. La vera Skota montano estas Teŭtona-Mediterranea.

Mi ŝuldas multe al la libreto de John Munro *Historio de la Brita Raso* (History of the British Race; Newnes), kiun mi konsilas Esperantistojn legi, kiel enkonduko al la scienco de antropologio

Kun granda bedaŭro ni anoncas, ke la agema Malta Societo ĵus estas perdinta S<sup>ro</sup>n A. Littlejohn, unu el la plej energiaj klopodantoj inter la fervora insulanaro. Kaj, por pruvi, ke malfeliĉoj neniam venas unuope, la sama grupo ankaŭ perdis la servojn de la helpanto, kiu estis tipografanta la novan ĵurnalon, pri kiu la Maltaj Esperantistoj nun klopodas.

Kaj la sekvanta sciigo el Rusujo ankaŭ estas precipe doloriga. "La 23 Septembro subite mortis Membro de la *Soceto Espero*, Ekscelenco Gregorij Nikolaeviĉ Ljubi, poŝtcenzuristo de eksterlandaj ĵurnaloj, kaj cenzuristo de la venonta Rusa ĵurnalo 'Esperanto.'"

La mortinto estis progresema homo, li multe faradis por la *Soceto Espero*, li penadis detruilacenzurajn barilojn rilatajn la lingvon Esperanto, kaj lia morto estas gravega perdo por ni Rusaj Esperantistoj.

British Esperantists will learn with pleasure that, just as we are going to Press, news has been received of the foundation of *The London School of Esperanto*. E. A. Millidge, Esq., one of our most able Esperantists (to whom we owe most hearty thanks for valuable assistance in revising the proofs of several of our numbers), will be the chief instructor. For information apply to the Secretary, 93, Chancery Lane, London, W.C.

The principal articles of late dealing with Esperanto have appeared in the *Sheffield Independent*, *Glasgow Evening Times*, *To-day*, and the *Church Family Newspaper*. This last has been especially useful, as a reference was given for further information, with the result that many new adherents have been gained, especially among the Clergy. If only contributors would remember never to let an article appear without some such reference, our progress would be even more rapid than it at present is.

## ANTAŬEN!

Originale verkita de William Officer.

Nun super la tero lumigas  
La tagoj feliĉaj kaj belaj,  
Brilecon de kiuj, longtempe  
La grandaj saĝuloj vidadis  
En siaj revadoj angelaj.

Leviĝu do, Esperantistoj!  
Antaŭen je nomo de Dio!  
Homaro, unue sensenta,  
Komencis gravecon kompreni  
De via altega misio.

Ĝis nun la nacioj estadis  
Fremduloj je penso kaj koro:  
Tro ofte iliaj jaluzoj  
Kaj malamikecoj plenigis  
La mond' je senfrukta doloro.

Al vi apartenas la tasko  
Grandega, senlime vastigi  
La lingvon *esperan*. Ĝi sole  
Posedas potencon magian  
La multojn en unu kunligi.

El scio larĝega, perfekta,  
La ĝia triumfo kreskigos,  
Simile al floroj, amecon  
Kaj pacon, regado de kiuj  
La homojn eterne ĝojigos.

Antaŭen, do, Esperantistoj!  
Antaŭen je nomo de Dio!  
Laboru fervore, seŭĉese!  
La sun' de sukceso ekbrilas  
Sur via altega misio.

## PLENDO DE LA LUNO.

Originale verkita de G.

Kolowrat Ĉervinski.

Dormas, silentas natur'  
Nur siluetoj montriĝas.  
Kaj sur ĉielo la lun'  
Tre malkontenta vidiĝas.

Tute sen ĝoj' ĝi rigardas,  
Eĉ falis larm' el okul'  
(Tiel almenaŭ mi revis)  
Ho, luno malfeliĉul'!

Diru pro kio senĝoje  
Tiel rigardas nun vi;  
Eble ne estas agrabla  
Plia fort' de l' sunrad'.

Ĉu miras vi la malbonon,  
Ĉu plendas vi, ke sur ter'  
Homo feliĉa ne estas,  
Kaj eĉ senpeka afer'?

Eble ekscii vi volas  
Estas por kio milit'  
Kial ne estas la pac'  
Ĉe la Dio kreit'?

Eble al mi vi demandas:  
Kial, je l' homa ĉagren',  
Lingvo neŭtrala malestas  
Por la komuna kompren'?

Restu do vi nun trankvila;  
Bon' venos de Esperant'  
Lingvo neŭtrala utila,  
Por ĉiu tera loĝant'.

Ĝi la militon forigos,  
Pacon aranĝos ja ĝi,  
Veran ekhavos la amon  
Tuta homar' inter si.

Kuros de l' mondo malbono,  
Multo en ĝi pliboniĝos,  
Perdos la lokon mizero  
Multaj eĉ plifeliĉiĝos.

Kaj forgesiĝos l' ofendo  
Al vi farita de l' sun'.  
Eble vi ekkontentiĝos,  
Ho bela, ho mia lun'.

Dormas, silentas natur',  
Nur siluetoj montriĝas  
Kaj sur ĉielo la Lun'  
Jam plikontenta vidiĝas.

Sed ne sen ĝoj' ĝi rigardas  
Kaj senlarmiĝis jam ĝi—  
(Tiel almenaŭ mi revis)  
Ĝi konsoliĝis de mi!

ANAKREONAĴO.  
Verkita de Rev. A. H.  
Nankivell.

Mi deziras pri famuloj  
Kaj prapatroj nun kantadi  
Kaj fortuloj batalantaj  
Kaj sanktuloj preĝadantaj,  
Honorindaj, memorindaj,  
Kuraĝemaj kaj mirindaj,  
Tiajn virojn mi laŭdadi  
Volas; aŭdu, feliĉuloj!  
Sed kor' mia kun moketoj  
Krias: "Mi ne volas aŭdi.  
Kantu nun pri la knabinoj,  
Delikataj belulinoj,  
Gajakoraj kaj amindaj,  
Belvizagaĵaj kaj kisindaj,  
Tiajn mi deziras laŭdi;  
Aŭdu, feliĉulinetoj!"

Tial mi adiaŭ diras  
Al fortuloj kaj sanktuloj,  
Militintoj kaj venkintoj,  
Adorintoj kaj preĝintoj;  
Kaj de nun pri virgulinoj,  
Karesindaj gajulinoj,  
Forgesinte pri bravuloj,  
Ĉiam kanti mi deziras.

LULKANTO. DORMU!  
Originale verkita de Edward  
Metcalf, M.A. (Oxon).

Dormu, dormu en lulilo  
Paĉja, panja korligilo;  
Panjo ja apude sidas  
Ci al panja am' konfidas,  
Ci en sendanĝero estos  
Panjo ja apude restos;  
Laŭ infana elkonfido  
Dormu, dormu, dorm'!

Kovras ja flugilaj vestoj  
Sur hirdetoj en la nestoj  
Sed flugiloj cin anĝelaj  
Kovras en mallumo helaj;  
Ci en sendanĝero restos  
Ĉar anĝeloj apudestos;  
Laŭ infana elkonfido  
Dormu, kara mia ido,  
Dormu, dormu, dorm'!

Dolĉa en lulil' trezoro,  
Ŝlosilet' de panja koro,  
Cin al brakoj mi konfidas  
Kies ci vizaĝon vidas;  
Ci en sendanĝero restas  
NIA PATRO apudestas;  
Laŭ infana elkonfido  
Dormu, kara mia ido,  
Dormu, dormu, dorm'!

## LA MALGRANDEGULO.

Originale verkita de

Clarence Bicknell.

Malgrandegulo foje amis  
Grandegulinon belan;  
Li diris: "Ĉu vi min edzigos,  
Amanton tre fidelan?"  
Sed ŝi respondis: "Malfeliĉe  
Mi estas tre miopa  
Sed ni ne povas eĉ vin vidi  
Per ilo teleskopa;  
Por mi vi estas tro malgranda;  
Mi restos amikino,  
Sed iu de la via kresko  
Konvenos por edzino."

Pro tio, poste, sian koron  
Al malgrandegulino  
Li donis, sed ŝi tuj respondis:  
"Ne estas mi virino  
Por vi; ni estas tro similaj  
La unu al l' alia,  
Kvankam al mia kor' vi estas.  
Amanto simpatia;  
Ĉar ne konvenas por edzeco  
Preciza egalpezo;  
L' edzino via devus esti  
Virin' de kreskomezo."

Foriris li, kaj longatempe  
Ne plu li enamigis,  
Sed fine, lia kor' per iu  
De mezokresk' bruliĝis.  
Sed ŝi, al la demand' fatala  
Respondis: "Tre ĝentila  
Vi estas, sed mi ne kunigiĝos  
Kun viro malsimila.  
La viro, kiun mi akceptos,  
(Nature, vir' samlanda),  
De mia kresko ankaŭ estos,  
Nek pli nek malpli granda."

"Ho, ve!" li tiam kriis, "kion:  
Mi faros, mizerulo?  
Neniu jesan vorton donis  
Al mi, malgrandegulo.  
Respondis ĉiuj al proponoj:  
'Vi havas koron aman,  
Sed tamen kreskon tro mal-  
grandan  
Aŭ saman, aŭ malsaman.  
Mi petas, ke vi diru ion.  
Por min ekkuraĝigi."  
"Tre efektive," ŝi respondis,  
"Ne penu edzinigi."

## MIAJ PAPERAMIKOJ.

Originale verkita fantazio de C. Oxenford.

Frapon! Ha, la poŝtisto—letero de unu el miaj paperaj amikoj. Vi ridetas, tamen estas vere. Mi havas multe da paperaj amikoj, tio estas amikoj, kiujn mi neniam estas vidinta; sed kiuj skribas al mi el aliaj landoj. Kaj tiaj bonaj amikoj! Ĝuste similaj al la libroj, la plej bonaj, kiujn oni povas posedi. Negrave kio mi estas vizaĝe, profesie; neniam ili permesos min senti, ke mi estas malbela, malsprita, neinteresa. Se mi ne estas vestata tiel bone, kiel aliaj, neniam ili turnas la kapon kiam ni renkontas nin, sed ĉiam ili salutas min kun amika rideto. Se mi estas laca, malafabla, kiam oni min vizitas, oni nek ekkoleras nek nomas min malafablulino, sed oni kvietigas min, kaj helpas min forgesi la kaŭzon de mia maltrankvileco.

Sed mi devas rapidi pretigi ilin akcepti. Ĉiuj miaj paperamikoj vizitos min hodiaŭ vespere. Kia amaso tie estos! Tiu ĉi salono apenaŭ ilin enhavos.

Mi estas ornaminta la ĉambron per floroj kaj, kiam la kandeloj estos lumigitaj ni aperos tute belegaj. Mian veston? Mi estas vera virino; mi estas vestinta min simila al la reĝino de Siba. Tiun vesperon mi trafas la deziron de mia koro: mi akceptas amikojn, kaj mi estas en plej gaja humoro.

Ha, ĉi tie venas la unua gasto.

Kiel vi sanas, Sinjoro . . . ?”

Ha, ha! vi supozas, ke mi estas dironta al vi lian nomon? Ne, ne!

Li salutas min; kia manpremo! Nuntempe oni premas manojn laŭ malnerva maniero, tute ekkoleriganta. Sed ne premu mian manon tro kore, amiko mia; vi viroj neniam konas viajn fortojn.

Nun la aliaj alvenas, kaj mi rapidas ilin akcepti.

“Bonan vesperon, Sinjoro . . . mi estas ĉarmata vin renkonti; kaj vin ankaŭ, Sinjoro. Kion vi diras? Ho, Ho flatantulo, foriru, estas facile vidi, ke vi elvenas el *La Belle France!*”

Sed kiu estas tiu ĉi grandegulo, kiu alportas kun li tian malvarman venton? Estas mia amiko el Rusujo; li estas sufiĉe aminda serĉi por mi poŝtmarkojn, kvankam li min konis nur malmulte da tempo. Mi devas paroli iom kun li, kaj prezenti lin al tiu ĉi ĉarma Fraŭlino el Aŭstrujo, kiu tiel timeme envenas en la salondon, kun mallevatataj okuloj. Ŝi estas juna Esperantistino, kaj devas esti kuragiĝata.

Kiu estas tiu ĉi sinjoro? Mi ne konas lin—sed

ne, mi memoras, li estas vidinta mian nomon sur la “*Adresareto de personoj kiuj deziras korespondadi,*” kaj deziras konatiĝi kun mi. Estimata Sinjoro, mi timas ke vi ne ĝuos kunvenon de fremduloj! Kion, vi estas botanikisto? Nu, jen kelkaj kuriozaj floroj; certe vi ĝuos ilian societeton, ĝis kiam mi povos trovi inter miaj gastoj similan spiriton por prezenti al vi.

Ankoraŭ alia gasto, kiu malalte kliniĝas por kisi mian manon. Tiu ĉi ago, ĉu ĝi estas laŭ miaj Anglaj idealoj de la konveneco? Ĉu mi permesos al mi ĝin akcepti? Sed, mi forgesas, nun mi estas kosmopolitanino, kaj mi konformas al la kutimojn de ĉiuj landoj.

Alia gasto, kaj ankoraŭ alia. “Bonvenon, miaj amikoj, bonvenon!”

Malgraŭ mia feliĉeco, mi iom malkontentiĝas: unu el miaj amikoj mankas; kaj mi estas pro tio tre malĝoja. Inter ĉiuj el miaj paperamikoj, li estas la plej ŝatata. Mi trarigardas la salondon, ne, tio ĉi li ne estas. Ha! Li envenas—“Mia kara Sinjoro, mi estas ĉarmata vin vidi. Venu, sidigu apud mi kelkajn minutojn, kaj diru kial vi estas tiel malfrua. Via Parizo, ĉu ŝi estas tiel ĝoja, ke vi ne deziras ŝin forlasi eĉ por unu tago?”

Mi ekrigardas ĉirkaŭ la salono—kun tiuj ĉi bonaj amikaj personoj ĉe mi mi estas feliĉega, sed—tamen estas—iom stranga,—nekomprenebla! Mi trovas min tute nekapabla rekoni eĉ unu personon. Tiuj vizaĝoj kaj tiuj formoj ŝajnas ĉiun momenton ŝanĝi. Kelkafoje oni estas blonda, kelkafoje bruna aŭ malhela. Unufoje oni estas granda, aliafoje malgranda! Ĉu miaj okuloj trompas min? Ho! kio okazas? Estas subite malvarme, mallume; la salono estas neokupata. Hu! mi vekigas tremetante. Nur estas sono. Ho ve! mi estas ankoraŭ sola. Nur spirite mi renkontis miajn amikojn, ili ja estas paperamikoj!

Eble, mi pripensas, estas tiom pli bone. Ve! kiam mi ekrigardas min spegule, kaj mi vidas malgrandan, malbelan virineton de maturaĝo, mi ĝojas, ke ili ne povas vidi min. Ĉu ili daŭras skribi al mi se ili povus min vidi kaj—sed ne, mi ne estos malamika, maljusta!

Tial miaj paperamikoj, al vi! Mi trinkas je via sano (kvankam nur per mia amata kafo) kaj mi dankas vin pro la multe da feliĉaj horoj, kiujn vi estas donintaj al mi; pro la multo da agrablaj ekskursoj, kiujn mi estas fantazie partopreninta kun vi; unuvorte, pro via amikeco. Ĝis la revido, amikoj miaj!



## KIMRA SKIZO VI.

Heroino malmulte konata. Originale verkita de E.W.

En 1849 mi legis en ĵurnalo de la Orientaj Hindoj, pri juna heroino kiu, sur la Kimra marbordo, estis superinta la gloran heroaĵon de Grace Darling. Mia spirito estis ankoraŭ tro okupita je la revolucioj de 1848 kaj ĝiaj sekvoj, por ke mi povu multe klopodi pri afero individua, sed, post dek ses monatoj, estante ĉe amikino, kiu bone konis Fishguard Golfeton kaj ĝiajn loĝantojn, mi ŝin demandis pri la nova heroino.

Al la tempo de la mirinda ago ŝi estis en tiu regiono kaj kompreneble estis vizitinta la familion Llewellyn. La patro estis fiŝkaptisto, tiel, kiel ĉiuj la vilaĝanoj, esceptinte unu butikisto kaj la drinkejmaŝtro. Li estis vidvo, havis vizaĝon inteligentan, sed li tute ne povis paroli nek kompreni la Anglan lingvon. Tamen liaj filinoj estis pli kleraj. Ili estis grandaj, fortikaj, kaj belegaj virinoj, la pliaga, Margareto, havis preskaŭ dudek kvin jarojn.

Mia amikino donis al mi kopion de la rakonto de la pli juna fratino, Marta. Jen ĝia resumo, multe mallongigita.

*Rakonto de Marta:* "Mi senvestigadis min, kaj mia fratino pregadis. Subite ŝi ekleviĝis de siaj genuoj ekkriante: "Mi aŭdis pafadon. Ŝipo estas inter la ŝtonegoj." Mi nenion aŭdis, sed ŝi komencis rapide sin vesti kaj ni kune eliris por doni averton.

Ekstere ni povis apenaŭ stariĝi, kaj la ŝaŭmo kun la ondoj sin jetis sur la voĵeton. Kiam ni atingis la drinkejon, nia patro kaj la ceteraj viroj kredis, ke ni ne povas esti alie ol frenezaj. Ili aŭdis nenian pafadon; la nokto estis tiel nigra, kiel la peĉo; nenia ŝipo volus proksimiĝi al la tero en tia vetero; se ŝipo tie estus, ili povus nenion fari por ĝin helpi; nenia boato povus naĝi unu minuton sur tia maro. Sed Mago (Margareto) ne volis reveni ĉe ni. Fotte alpremanante unu la alian, kaj ofte falante, ni marŝis laŭlonge la krutaĵon, kiu ne estas alta kaj kiu, je diversaj lokoj, superpendas la maron. Niaj okuloj kutimiĝinte al la mallumeco, ni vidis la blankan ŝaŭmon kune kuu granda nigra makulo, kaj, apud ĝi, malgrandajn makulojn. Ŝi diris: "Jen estas la ŝipo, tiuj estas dronontaj maristoj; ni devas savi ilin!" Ne malproksime estis du stangoj, kaj ankaŭ fortaj ŝnuregoj kaj turniloj por suprentiri la boatojn kiam oni atendas ŝtaron. Mago komencis tordi ŝnuregojn ĉirkaŭ sia talio. Mi komprenis, ke ŝi jetos sin en la ondegojn, kaj mi diris: "Ho! memoru pri via senmorta animo; ĉu vi estas certa, ke ĝi estas savota?" Ŝi respondis: "Tio ĉi tute ne estas grava, mia nuna devo estas savi tiujn ĉi dronontojn." Mi penadis

fortiri la ŝnuregon, por ke ŝi ne sin alligu, sed ŝi fariĝis tute furioza kaj laŭte ekkriis: "Mi ja iros en la maron; se vi ne faros tion, kion mi ordonos, se vi ne turnos la turnilon, kiam mi elvokos, vi estos tiu, kiu mortigis sian fratinojn."

Ŝi kuris, kun la ŝnurego alligita, kaj ŝi saltis kiel eble plej forte. Subite mi sentis ekskuon, mi turnis kaj tiris; ŝi suprenvenis kun viro inter siaj brakoj. Ŝi metis lin sur la herbon; donove ŝi saltis, kaj mi turnis la tenilon; dua viro saviĝis—poste tria. Nun, la ŝnurego estante preskaŭ tranĉita, ŝi sendis min al la drinkejo por alvoki helpon.

Dume ŝi prenis ŝnuregon de alia stango kaj alligis ĝin ĉirkaŭ sian korpon. Homoj alvenis kun lankovriloj, brando, lanternoj kaj ujoj da varmega akvo. Mi helpis ĉe la malsekaj, nekonsciaj maristoj. Kelkaj viroj laboris la turnilon, kaj Mago suprenportis kvaran viron, sed ondego jetis ilin kontraŭ akran ŝtonegon, kaj lia cerbo kaj sango ŝpruciĝis sur ŝia gorgo kaj kolo. Ŝi ŝajnis morta, sed poste ŝi englutis iom da brando, kaj sin jetis en la maron kaj savis la lastan viron. Nun la laboro de Mago estis finita, kaj ŝi ploregis. Ni flegis ŝin, portis ŝin hejme, kaj kuŝis ŝin lite, sed ĉiam ŝi ploregadis; eĉ nuntempe, kiam ajn ŝi ne povas dormi, ŝi senĉese ploras."

Kompreneble, mi tre deziris vidi Margareton, ĉar oni diris, ke ŝia vizaĝo similas eĉ pli ol antaŭe al Sankta Virgulino de Rafaelo, sed mi ne povis. Ŝi akceptis multajn vizitantojn, sed kun neniu ŝi parolis pri la ŝippereo.

Li tiama episkopo de St. Davids estis D<sup>ro</sup> Connop Thirlwall, la klera historiskribanto de antikva Grekujo. Li simptiis kun la Kimroj, kaj eĉ estis lerninta ilian tre malfacilan lingvon. Li sendis al la du fratinoj £100 (2,500 frankojn) je signo de admiro pro ilia nobla sindoneco. Li ankaŭ komunikis al la direktoroj de *Lloyds* la detalojn pri la afero, kaj ili sendis al Margareto £100, kaj pergamenon iluminitan, sur kiu ili dankis ŝin pro tio, ke ŝi estas savinta la vivon al tri maristoj. (Efektive nur tri estis savitaj, ĉar unu el la kvin mortis malmultajn tagojn post la ŝippereo). Tiamaniere la familio riĉiĝis.

Kiam mi denove estis en Kimrujo, mi intencis viziti la familion Llewellyn, sed oni min sciigis, ke Marto edziniĝis je Koloniano, kaj la tuta familio estis elmigrinta.


La nomo de Margareto Llewellyn estas verŝajne forgesita de ĉiuj krom kelkaj maljunuloj.

Ofte mi pensas, kiel feliĉa estas ŝia sorto, povi plenumi faron tiel heroan, kaj tamen eviti la degradecon de publika sciado.

COPYRIGHT, 1904  
THE ESPERANTIST, LONDON

# Nia Lando

WORDS & } F.G. ROWE  
MUSIC BY }



1. 2 & 3 Kie estas nia lando, Nia kara lingvo-lando?  
4 Nia lando estas ĉie, ĝiaj limoj ja nenie!



1. Ĉu Rusu-jo, paci-enca, Al la lumo baraktanta?  
2. Ĉu Anglujo tiel rega Ĉie ĉi am okupega?  
3. Ĉu Francujo kunbeleco. Liber-egal-fratbraveco?  
4. Kie premas manon mano, Nune kun Samideano;



1. Ĉu Svisu-jo kunmont-anoj, Domo ja de liber-anoj?  
2. Aŭ en fil-haci-oj ŝi-aj, Ne dependaj energiaj?  
3. Germanu-jo kunpensuloj, Mal-rapid' sed persistuloj?  
4. Aŭ salut-o aŭd-igata, Aŭ stele-to vidigata.



1. 2 & 3. Grandaj ti-uj landoj estas Sed pli granda nia estas!  
4. Kie ajn la klopodanto. Estas lando Esperanto!

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

EDITED BY DR. HILFENSTADLER HILF, 27, Kensington Square, London, W.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (3 francs; 1½ roubles; 75 centes.)

POSTAGE PAID BY THE EDITOR, LONDON, W.

## CONTENTS.

|   |     |
|---|-----|
| EDITOR'S PAGE   | 298 |
| WIKKA-SAKTA VII. (E.W.)   | 310 |
| TRUSTEY AN IZBOLANOVAN (Dr. Gombay)                                     | 311 |
| EMAS FIJANON (Jen. Joh. Abovahl)  | 312 |
| OSTROV AN ERMANAN LAKOVAN<br>(Henry J. Baudouin)                        | 313 |
| THE DEER AND THE AMERICAN<br>(Hay H. Taylor)                            | 314 |
| LETTERS FROM SWITZER (Edmond Bernard)                                   | 316 |
| OUR S. LINGVO   | 318 |
| A VERGILIAN APHEU (H. H. Lambert,<br>E.A.)                              | 319 |
| THE THIRTIETH OF THE FIFTY (H. H.<br>Ward, translated by Henry<br>Ward) | 320 |
| MR. LARK AND HIS (Edward Bland,<br>M.A.)                                | 321 |
| THE SAILORS (Tom Elmy)  | 322 |
| FORGOTTEN AND FORGOTTEN? (Charles<br>Hobson)                            | 323 |
| THE BIRD OF NATURE (G. M. Loyd)   | 324 |
| HEAR YE! THE ESPERANTIST (Edith<br>Voss)                                | 324 |

For local information apply to the Hon. Secy. of the following Official Societies:

|   |
|---|
| Amer.—Dr. K. J. BAST, 112 Gray Street, New York.      |
| Argentine—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.  |
| Australian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York. |
| Belgian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Bohemian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.   |
| British—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Canadian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.   |
| Chinese—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Danish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.     |
| German—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.     |
| Greek—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.      |
| Hebrew—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.     |
| Hungarian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.  |
| Indian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.     |
| Irish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.      |
| Italian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Japanese—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.   |
| Korean—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.     |
| Latin—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.      |
| Malay—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.      |
| Polish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.     |
| Portuguese—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York. |
| Russian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Spanish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Swedish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Swiss—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.      |
| Turkish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |
| Ukrainian—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.  |
| Yiddish—Dr. J. M. BAST, 112 Gray Street, New York.    |

**The Remington**  
**THE UNIVERSAL TYPEWRITER.**

*Just think of it!*  
**THE INTERNATIONAL MACHINE.**

Designed by the best engineers in the world.  
The most perfect form of machine of all mechanical machines.

The Remington and its accessories sold by  
Remington.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY, INC.  
100 Broadway, N. Y., U.S.A.

**La Remington**  
**LA UNIVERSALA ESKRIBMAŝINO.**

*Pripense je tio!*  
**LA INTERNACIA MAŝINO.**

Ĝi estas konstruita de la plej bonaj teknikistoj de la mondo.  
Ĝi estas la plej perfekta formo de maŝino de ĉiuj mekanikaj maŝinoj.

La Remington kaj ĝiaj akcesoriaj artikoj vendiĝas  
de Remington.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY, INC.  
100 Broadway, N. Y., U.S.A.

**ĈIUJ NI POVOJ  
PARADIZON IRL.**

|                   |                   |
|-------------------|-------------------|
| Ĉiu, kiu volas... | Ĉiu, kiu volas... |
| Ĉiu, kiu volas... | Ĉiu, kiu volas... |
| Ĉiu, kiu volas... | Ĉiu, kiu volas... |
| Ĉiu, kiu volas... | Ĉiu, kiu volas... |
| Ĉiu, kiu volas... | Ĉiu, kiu volas... |

Ĉiu, kiu volas...

**The "Review of Reviews"**

*Is the Best Magazine for Every People*  
*And it is read by 'Esperanto's' STUDENTS.*

The Review of Reviews is the only one that contains in it  
the best articles of the most famous authors of the world.

The Review of Reviews is the only one that contains in it  
with intelligent criticism the most important news of the world.

**Post Free for Twelve Months, 5/6.**  
14 N. 10-A, W. 3rd Street

Order: NOWBENT BOOKS DEPOT, LONDON.

**Adresarelo de Personoj kiuj deziras Korespondadi.**

- Sen. E. W. CUMMERS, 35, Hayden Road, Liverpool. (Korespondantoj kun aliaj lingvoj) (Ĉiu p. 4. 40. 40. 40. 40.)
- Sen. R. FRANKS, 10, Franks Road, Tinsbury Works, Kent. (Interlingvoj) (Ĉiu p. 4. 40. 40. 40. 40.)
- Captain H. E. JAMES, Aden, Arabia. (Ĉiu lingvo, kun interlingvaj lingvoj) (Ĉiu p. 4. 40. 40. 40. 40.)
- Sen. Henry G. KING, The Wind, Barbados, B.W.I. (Kun aliaj lingvoj) (Ĉiu lingvo) (Ĉiu p. 4. 40. 40. 40. 40.)
- Sen. G. MURPHY JONES, 37, Dartmouth Park Hill, London, N.W. (Kun lingvoj) (Ĉiu lingvo) (Ĉiu p. 4. 40. 40. 40. 40.)
- Sen. HENRY JONES, 9, Torrington Avenue, London, E.C. (Ĉiu lingvo) (Ĉiu p. 4. 40. 40. 40. 40.)

**CHRISTMAS POSTCARDS.**  
Vendita en Esperanto.  
Per Pack of Twelve, 7d.  
POST FREE

Ĉiu, kiu volas...

**THE LONDON  
School of Esperanto.**  
HOLLIER AND HOLLIER,  
TUTORS.

Ĉiu, kiu volas...

# THE ESPERANTIST.

The Esperanto Gazette for the spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Beynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Cnurtral.  
FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Myba, 88, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 82, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpaĝon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redakto, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

Vol. I., No. 14.

DECEMBRO, 1904.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

AL LA REDAKTOROJ DE ĈIUJ ESPERANTAJ GAZETOJ.—KARAJ KOLEGOJ,

Ni ĉiuj klopodas pro la disvastiĝo de nia kara lingvo, kaj ni ĉiuj devos uzi tiujn ilojn, kiuj plej interesos niajn Legantojn. Kun granda plezuro mi vidas, ke ĉiuj la Esperantaj Gazetoj fariĝas pli kaj pli interesaj kaj vidindaj, kaj montras nepran pruvon de nia progreso.

Mi tamen tre surprize vidas, ke diversaj el la Esperantaj Gazetoj enpresis verkojn, eltiritajn el THE ESPERANTIST, sen la necesa permeso aŭ anonco.

Kvankam oni ĝenerale tre kontente permesos la uzon aŭ tradukon de multaj artikoloj el tiu ĉi Gazeto, la aŭtoroj esperas, ke oni ne plu represigos ilin, sen antaŭa permeso.

Kun alta estimo, ĉiuj bondeziroj, kaj internaciaj salutoj, mi estas fidele via,—LA REDAKTORO.

Sendube legantoj vidis, ke la lastaj numeroj de THE ESPERANTIST ne enhavis multajn dulingvajn artikolojn. La Redakto ricevis leterojn plendantaj kaj gratulantaj pro la sama forigo.

Se multaj legantoj anoncos ke ili ŝatas la dulingvajn artikolojn, kaj trovas ke ili helpas je la akiro de la lingvo, ĉiuj numeroj enhavos kelkajn dulingvajn paĝojn.

Dum la monato ni ricevis:—

“Rakontoj pri Feinoj,” de Charles Perrault, tradukitaj de S<sup>ino</sup>. Sarpy (84 pp., 1 franko).

“La Evolucio de la Lingvo Internacia,” en la Bulgara lingvo, de Jonko Davidov (51 pp., 50 centimoj).

“Esperanta Versfarado,” de J. Parisot and T. Cart (15 pp., 30 centimoj).

“Het Wetenschappelijk Vraagstuk eener Kunstmatige Taal,” de E. Collardeau, tradukita Holande de J. Neerdaels (26 pp.); kaj diversajn bonepresitajn broŝurojn de Hauptmann Borel, 95, Prinzenstrasse, Berlin, N.W. (en la Germana lingvo).

S<sup>ro</sup>. Lyndridge, la verkisto de la *Ekzercoj de Stenografio Esperanto*, anoncitaj sur nia kovrilo, deziras anonci ke li rondirigas inter siaj korespondantoj kajeron de THE ESPERANTIST verkita stenografie.

Bedaŭrindege, la eldoniĝo de “La Ventego” ankoraŭ prokrastiĝas. La belarta eldono aperos frue Decembre, kosto 3 frankoj, sed mendoj je la abonprezo de 2 fr. 50 akceptiĝos ĝis Decembro 5<sup>a</sup>.

Doubtless readers have seen that the last numbers of THE ESPERANTIST have not contained many bilingual articles. The Editor has received letters complaining and congratulatory of the same disuse. If many readers will send notice that they appreciate the bilingual articles, and find that they help in mastering the language, all issues will contain some bilingual pages.

During the month we have received:—

“Fairy Tales,” by Charles Perrault, translated by S<sup>ino</sup>. Sarpy (84 pp., 10d.).

“The Evolution of the International Language,” in Bulgarian, by Jonko Davidov (51 pp., 6d.).

“Esperantic Versification,” by J. Parisot and Th. Cart (15 pp., 4d.).

“The Question of an Artificial Language,” by E. Collardeau, translated into Dutch by J. Neerdaels (26 pp.); and sundry well-printed brochures from Captain Borel, 95, Prinzenstrasse, Berlin, N.W. (in German).

Mr. Lyndridge, the author of the *Exercises in Stenographic Esperanto*, advertised on the cover, wishes to announce that he sends round among his correspondents a copy of THE ESPERANTIST in shorthand.

Unfortunately, the publication of “La Ventego” is still delayed. The art edition will appear early in December, price 2s. 6d., but orders at subscription price of 2s. will be accepted till December 5<sup>th</sup>.

## KIMRA SKIZETO VII.

Malnova Ferakonto. Esperantigita de E.W.

Unu fojon, antaŭ longege, loĝis en bela trunkvila valetto viro nomita Johano, kaj sia edzino Mario. Ili estis nejunaj kaj solaj. Antaŭe ili havis du infanojn, kvarjaran knabeton kaj dolĉan dujaran filineton, sed ili ambaŭ mortis. La gepatroj ofte ploregis ilin, kvankam ili estas bonaj Kristanoj, kaj neniam volis murmuri kontraŭ Dio.

Ili laboris senĉese kaj saĝe, tiel ke ilia dometo, ĝardeno kaj kampo estis modeloj da pureco kaj beleco. Iliaj bestoj estis grasaj kaj bonezorgataj.

La geedzoj estis amataj de la najbaroj, por kiuj ili faris ĉian eblan servon. Sed la edzino malsaniĝis; ŝi ne volis konfesi sian suferon, ĉar ŝi timis tro malĝojigi sian fidelan Johanon.

Li vidis nenion, ĉar ŝi adoris lin tiel, ke ŝiaj vangoj ĉiam ruĝiĝis kaj ŝiaj okuloj briliĝis kiel helaj steloj, kiam ajn li rigardis ŝin. Li ja nenion vidis; sed multaj amikoj vidis kaj kore simpatiis kun la kompatindaj geedzoj.

Tiuj ĉi helpemaj estaĵoj, la feoj, loĝas en proksima arbaro, kaj nokte dancadas sur la kampoj. Ili ja meritas la nomon donadatan al sia raso de la Kimraj kamparanoj. Ili vere estas "la bonaj etuloj"; ili amas la diligenton kaj la purecon, kaj ili amegas la honestecon, la veramecon, kaj la bonkorecon.

Ankaŭ ili estas dankemaj; kaj nesciante Johano kaj Mario estis farintaj multajn bonajn servojn je ili.

Tial okazis, ke, unu matenon, kiam Mario, pala kaj laca eliris por melki la bovinojn, ŝi trovis ilin jam mangantajn la freŝan furagon.

Enirante en la laktejon, ŝi vidis, ke tuta ŝia matena laboro estis bone farita. Multaj funtoj da bela flava butero staris sur grandaj pladoj, la buter-lakto estis en barelo, preta por ke Johano donu ĝin al la porkoj mangaĵe, la nova lakto jam estis kribrita kaj verŝita en purajn vazojn; ankaŭ ĉiuj aliaj ujoj estis brogitaj. Enfine ŝi nenion havis fari, krom hejti la supon kaj panetojn por matenmanĝo. Tial ŝi ripozis sin kaj pensis pri Johano. Ŝi kredis, ke li estis farinta tutan ŝian laboron. Ŝi ĝuis tiun ĉi provon de lia konstanta amo kaj lin dankis en sia koro. Sed poste ŝi timis, ke li devis scii ŝian suferon, kaj ŝi tre malĝojis. Tamen, kiam li revenis hejmen, koloro kaj brilo ŝanĝis ŝian vizaĝon tiel, ke li ne vidis ian signon de malsaneco.

Ŝi deziris danki pro lia helpo, sed ŝi timis paroli, ĉar ŝi estis ankoraŭ tro kortuŝata, kaj, plorante, ŝi lin ĉagrenigus. Ŝi faris do siajn hejmajn aferojn

kun amplena koro kaj silenta dankemo. Morgaŭe, denove trovinte sian tutan eksterdoman laboron bonege efektivan, ŝi ekpatis al Johano ke li ne tiel lacigu sin pro ŝi. Ili ambaŭ miregis, kaj, post longa interparolado pri la afero, ili kredis, ke iliaj nevideblaj bonfaristoj devis esti "la bonaj etuloj." Por samtempe certigi sin kaj montri sian kontentegon, ili metis, apud la ŝtuparo, grandan pecon de la plej bona blanka pano kune kun freŝa butero kaj vazo plena da ĵusmelkita lakto. Morgaŭe, la regalo ne tie troviĝis; la geedzoj do sciis ke la feoj ja servos ilin, tial ili laŭdis Dion pro tiu ĉi favoro, kaj ili amis Liajn bonajn Estaĵetojn.

Vintriĝis, Mario pli malsaniĝis. Sia tuta laboro ĉiam estis farata de la feoj, kiuj ankaŭ helpis Johanon. Ili ja plezure estus farintaj ĉiom, kiom li bezonis, sed ili estis saĝaj, kaj sciis, ke li pli suferus, neokupate. Ĉiu nokte, ili ĝuis sian simplan ragalon.

Enfine, la morto disigis, dum kelka tempo, la du amantojn. La tombo de Mario superploradiĝis de Johano, beletigis de la Gefeoj. Nenie kreskis pli verde la herbo; nenie floris pli brile la floroj, nenio difektiga insekto povis proksimiĝi al la sankta loko!

La feoj servadis ankaŭ la vidvon, kies domo, ĝardeno kaj kampoj fierigis la parohanojn. Oni estus kredinta, ke li havis multajn laboristojn, kaj oni enviis lin. Li tamen tre malĝojis.

Pli ol unu virino volis konsoli lin, kaj fariĝi la mastrino de tiel bela bieneto.

La plej ruza el liajamikoj lin kaptis, kaj edzigis. Ŝi estis junulino tiel obstina kiel egoista, kiu nek ŝatis liajn virtojn, nek bedaŭris lian melankolion, sed kiu antaŭvidis por si vivon facilan kaj ĝojon, vidviniĝinte. Ŝia unu deziro estis amasigi monon. Baldaŭ ŝi komencis malplezure meti la kutiman porcion por la feoj. "Kial ili devos ricevi pli bonan nutraĵon ol aliaj farmlaboristoj?" ŝi demandis. "Ĉar ili amegas Marion kaj laboras senpage," respondis Johano; "ankaŭ ili estas la plejmulton donintaj al mi el miaj amikoj."

De tiu ĉi tago li mem lasis la noktan regaleton. Post kelkaj monatoj, li bezonis forlasi sian hejmon dum tri semajnoj, sed li ne foriris sen peteginte sian edzinon, ke ŝi neniam forgesu siajn helpemajn amiketojn, kiuj certe meritis ĉian dankesprimon eblan. Ŝi ja promesis ilin memori, sed ŝi ne diris tion, kion ŝi intencis doni al ili.

Tiel okazis ke, unu nokton, kiam la bonaj

etuloj estis farintaj la tutan laboron, ili nur trovis pecojn da nigra ŝima pano kaj kelkajn la malbonolorajn sekigitajn harengojn. Treega estis ilia kolero! Ekkriante, ili kuregis en la ĉambron de la avarulino, pinĉis ŝin de kapo al piedoj ĝis iliaj viglaj fingretoj estis lacaj kaj ŝi preskaŭ svenis. Pinĉante, ili senĉese kantis versojn:

*Nigra pano kaj hareng' odoras  
Viaj dikaj flankoj ja doloras.*

Tiam, kun grandega peno, ili elpuŝis ŝin el ŝia lito, kaj trenis ŝin malsupren, gaje ekridante kiam, balante de unu ŝtupo sur alian, ŝia kapo ricevis baton.

Enfine, ili forlasis ŝin, duone senvivan, apud la pordo, kaj malaperis. De tiu tempo la malfeliĉulino devis ĉion fari kaj ankaŭ toleri la koleron de Johano, de kiu ŝi ne povis kaŝi la kaŭzon de la forkuro de liaj multjaraj helpantetoj.

Ŝia vivo estis senĝoja, tamen trankvila, ĝis Johano mortis. Apenaŭ li enteriĝis, kiam ŝiaj

turmentantoj revenis. Nokte ili melkis la bovinon kaj forpelis ilin kun la bovojn, bovidojn kaj porkojn sur la kampojn de la najbaroj. Ili ŝtelis ĉiujn ovojn de kokino, anasino anserino kaj kolombino. En la dometo povis neniu ĝui noktan ripozon. Bruoj, batoj, pinĉoj, nebligis dormon. Nek sciulo nek pastro povis forpeli la ofenditajn kaj malicajn feojn. Pro tio, post mallonga tempo kaj multe da ĉagrenoj, la vidvino forlasis senespere sian domon kaj belan bieneton, kaj vivis malriĉa kaj malestimata inter fremduloj.

Kontraŭ ŝi estis la bonaj etuloj tro kruelaj, sed oni devas memori, ke tiuj ĉi strangaj estaĵoj ne estas Kristanoj baptitaj. Kredeble ili neniam estis aŭdintaj la ordonon: "*Faru bonon kontraŭ tiuj, kiuj kontraŭ vi malbonon faras.*" Ili nur komprenis la leĝon: "*Kontraŭ bonuloj bone agu*"; kaj mi kredas, ke ili honeste obeis tiun leĝon.

Certe mi neniam aŭdis nek legis pri feo aŭ feino nedanka!

## INSTINKTO AŬ INTELIGENTECO.

Vera rakonto de D<sup>ro</sup>. M. P. Gambier (O.W.)

Karaj gelegantoj, mi rakontis al vi la lastan fojon, historion pri porkino, kiu sciis kalkuli siajn idojn. Hodiaŭ mi parolos al vi pri alia besto.

Unu el miaj amikoj, pasia ĉasisto, havis hundinon bonan, belan kaj tre fidelan. Ian tagon la hundino, kiu estis graveda, de malproksime sekvis sian mastron, kiu ne volis kunkonduki ĝin por ĉasi. Kiam ĝi estis sufiĉe malproksime de loĝejo, ĝi montriĝis al sia mastro, kiu estis tre malkontenta ĝin ekvidante. Li ne volis reveni hejmen kaj daŭrigis sian vojiron ĝis sia kampara domo; proksime de tiu domo estas arbareto.

Kiam li alvenis al la domo, li ne vidis plu sian hundinon, li ĝin alvokis voĉe kaj fajfe por ke ĝi revenu, sed senutile; la hundino ne revenis.

Kiam eknoktiĝis, mia amiko revenis hejmen. Tie li informiĝis pri sia hundino; sed ĝi ne estis reveninta. Kiam estis la horo por kuŝiĝi, li aliris al la ĉevalejo, kie ordinare kuŝas la hundino, ĝi ne estis ankoraŭ reveninta. Tiam oni lasis la pordon de la korto malfermita, por ke, se la hundino revenu nokte, ĝi povu aliri sian kuŝejon.

Mia amiko, tre maltrankvila pri sia hundino, matenfrue levigis, kaj tuj aliris la ĉevalejon kie li vidis la hundinon kun *sep* hundidoj. Li tre miris, kaj tute nesciis kio estis okazinta.

Sed la mistero estis post nelonge klarigita: oni

estis vidinta la hundinon sur la vojo al Loudun kun unu hundido en la buŝo. Tiu kiu estis ĝin vidinta miris, kaj li ĝin spionis. Li rimarkis, ke la hundino rapidas al Loudun, kaj ĉar li konis la beston, li aliris al la kampara domo de mia amiko. Post nelonge li vidis la hundinon, kiu rapide revenas; li vidis ke ĝi eniras la arbareton, kaj poste, li vidis la hundinon, kiu forkuras al Loudun kun ankoraŭ unu hundido en la buŝo.

La kamparano tiam eniris la arbareton kaj esploris ĝin. Li fine eltrovis la lokon kie estas la hundidoj. Li kaŝiĝis kaj atendis. Post nelonge la hundino revenas kaj prenas unu el siaj idoj. Ĝi revenadis ĝis ĉiuj forportiĝis.

La kamparano aliris Loudun'on kaj rakontis la aferon al mia amiko, kiu decidis, pro la sindonemo de la patrino, ke li ne mortigus eĉ unu idon.

La loko kie la hundino estis naskinta siajn idojn estis je kvar kilometroj (du kaj duono mejloj) de Loudun, vojaĝo je ok kilometroj (5 m.) estis do necesa por ĉiu hundido.

La hundino faris do, en unu nokto, 56 kilometrojn (35 m.).

Tiu besto sciis do ke ĝi havis *sep* idojn, kaj ĝi lasis nenium el ili.

*Ĉu estas eble ne admiru tiun patrinan sindonemon kiam oni vidas virinojn, kiuj mortigas siajn infanojn!*

## KRISTNASKA PUDINGO.

Jem Ross Archibald.

[Dum miaj Esperantaj vojaĝoj, mi kun granda miro eltrovis, ke oni tute nenion konis pri tiuj mirindaj pudingoj kaj kukaĵoj, kiuj tiel prave fierigas ĉiujn Britajn korojn. Eĉ la necesega *Buno* mankis, kaj mi devis sendi specimenojn al Franca kolego, por ke ili allogu lin viziti, kiel eble plej baldaŭ, tiun ĉi belan insulon.

Kiam do Legantino afable proponis sendi recepton por la faro de Kristnaskaj Pudingoj, mi kontenteghe akceptis la bonvenan proponon, sciante ke ne nur la inaj legantoj, sed ke ĉiuj kontente gustumos, eĉ nur spirite eble, niajn naciajn manĝaĵojn.—*La Redaktoro*].

| Fluidaĵo.            | Utila Tabelo.                     | Sekaĵo.                                     |
|----------------------|-----------------------------------|---|
| 2 Teokuleroj ...     | = 1 Pudingokulero ...             | = 1 unco (oz.) da Butero.                   |
| 2 Pudingokuleroj ... | = 1 Supokulero ...                | = 1 unco (oz.) da Sekaĵo.                   |
| 6 Supokuleroj ...    | = 1 Teotaseto ...                 | = 4 uncoj ( $\frac{1}{4}$ funto) da Faruno. |
| 2 Teotasetoj ...     | = Duonpajnto, aŭ 1 matenmanĝotaso | = 8 uncoj ( $\frac{1}{2}$ lb.) da Faruno.   |

N.B.—1 pajnto = ĉirkaŭ  $\frac{1}{2}$  litro; 1 lb. = 1 funto ( $\frac{1}{2}$  kilo); 1 oz. = 1 unco (30 gramoj).

Farigu la pudingon kelkajn semajnojn antaŭ Kristnasko.

Prenu grandan poton kun bolanta akvo, ankaŭ du buteritajn pelvojn, du pecetojn da buterita papero, kaj du pecetojn da kalikoto kaj ŝnureto.

*Materialo.*—1 lb. Riboj (purigu ilin lavante).

$\frac{1}{2}$  lb. Miksita Kandita ŝelo (Dishaketu).

$1\frac{1}{2}$  lb. da raspita pano.

$\frac{1}{2}$  lb. da Faruno (Sekigu kaj kribru ĝin kun tri teokuleroj da kuirpudro).

1 lb. da Bovaĵsebo dishakita.

$\frac{1}{2}$  lb. da kribrata sukero.

$\frac{1}{2}$  lb. da Siropo.

Ankaŭ teokuleroj da miksitaj spicoj, kiel sekve—

4 da pudrita zingibro.

1 da pudritaj kariofiloj.

1 da raspita muskato.

Malgranda vinglaso da brando.

1 grandega teotaso da lakto.

Ses ovoj (batu la ovflavojn ĝis malpezaj, kaj la ovblanko ĝis iom rigida saŭmo).

*Metodo.*—Kunmiksi traie la sekajn materialojn, poste aldonu siropo, brando, ovojn kaj kelkajn salerojn (laŭgusto). Agitu rapide per ligna movilo; tiam per kulerego metu la miksaĵon en la buteritajn pelvojn, kaj atentu, ke ili estu tute plenegaj. Kovru ilin unue per la buteritaj paperoj, kaj pecetoj da kalikoto. Tiam zorge ligu ilin ĉirkaŭ la supro per ŝnureto.

Tuj kiam la akvo bolas en la grandega poto, subakvigu la pelvojn kaj atentu, ke la akvo efektive boladu ses horojn en la unua tago. (La

poto devas ĉiam esti akvo plena). Tiam ellevigu la pelvojn el la akvo. Kiam la pudingo estas manĝota, resubakvigu ĝin (kompreneble ankoraŭ en la pelvo!) en bolantan akvon kaj reboligu ĝin du horojn (J.R.A.).

[Mi nun aldonos kelkajn sciigojn pri la fablesco pri tiu ĉi glora pudingo.

(i.). Neniam mangu la novfaritan pudingon antaŭ Kristnasko. Alie estos certe la morto okazos en la familio. Ne estas necese, ke tiu, kiu manĝis mortu, sed eble estu nur parenco, kiu aniĝos de la Plimulto. Sed ĉu ĉiu homo ne estas ĉies parenco?

(ii.). Kiu trovos grajnon inter la miksaĵo ne devas sciigi la trovon, alie la pudingfarinto estos tre malkontenta.

(iii.). Bona pudingo estas simila al bona vino; monato post monato ĝi pliboniĝos. Sed oni devas atenti, ke la musoj ne konstruu en ĝi siajn nestojn. Ili ja ŝatas tian oportunan kuŝejon!

(iv.). Tiu, kies stomako ne estas sufiĉe forta, eble malŝatos la kanditan ŝelon. Sed aliaj tre ĝuas la interesegajn songojn, kiuj ofte postvenas tro da tiu ĉi manĝaĵo. Sed oni povos prave demandi: "Ĉu estas eble havi tro da tia pudingo!"

(v.). Tiuj, kiuj pliamas vidon ol bonguston, flamigas la pudingon kiam ĝi estas enportota en la manĝoĉambro. La lumoj estas estingataj, oni surverŝas ĝin iom da brando, kaj ekbruligas ĝin per alumeto. Post tiu ĉi ago, la gusto estas precipe malbona se, kiel ofte okazas, multaj migdaloj estas ŝovitaj en la pudingon haŭton.

(vi.). Je specialaj festoj, precipe kiam multaj junuloj ĉeestas, estas kutime enmeti en la pudingon diversajn argentajojn. Ekzemple, tiu kiu trovas monereton estos bonŝanca dum la venonta jaro. Sed se la trovinto malfeliĉe disrompis al si denton



ke ĝia trovo, oni supozas, ke la bonŝanco duobligos. Tiu kiu trovas fingringon aŭ butonon edziĝos neniam, sed, kontraŭe, la trovanto de fingroringo edziĝos pli frue ol la aliaj.

(vii.). Ĉiuj Bonaj Britoj metas sur la manĝotan pudingon belan beroplenan etan branĉeton de ilekso. Ankaŭ la nacia standardo estas ofte tie fiksata. Estas ja nacia pudingo!

(viii.). Se membro el la familio okaze forestas alilande, estas la kutimo sendi al li unu el la familiaj pudingoj. Tiu ĉi kutimo kredeble tre plaĉas Lian Moŝton la Poŝtestron, ĉar la deviga poŝtpago estas sufiĉe granda.

(ix.). Mi finas tiujn ĉi sensensaĵojn per saĝa konsilo:—

Manĝu Kristnaskan Pudingon ĉiam kaj ĉie. Kaj, kiam vi havos la okazon, sekvu la ekzemplon de la fama Dickens' a knabo "Oliver Twist," kaj "petu pli" da ĝi!

Mi ja scias, ke tiu ĉi pudinga temo estas multe pli riska ol diversaj Religiaj aŭ Politikaj aferoj. Ĉiuj dommastrinoj estas tre fieraj pli siaj propraj puding-receptoj, kaj, kompreneble, plaĉus al multaj Legantinoj kontraŭbatali la nomitajn proporciojn, se nur ili povus tion fari, sen malkaŝi siajn "specialajn sekretojn."—*La Redaktoro.*]

## LA NASKLANDO DE EŬROPAJ LINGVOJ.

Origine verkita de George Henderson.

La artikolo en la Novembra numero de la *Esperanta Gazeto* pri "Kranioj" kondukas miajn pensojn al la temo de la Historio de la Rasoj kaj Lingvoj de Eŭropo.

Estas iom stranga koincido, ke la patrujo de Doktoro Zamenhof estas la nasklando ne nur de la plej nova inter Eŭropaj lingvoj—Esperanto—sed ankaŭ de la plej antikva, originala, praa lingvo el kiu ĉiu hodiaŭa lingvo de Eŭropo (krom la Baska, la Hungara, la Fina kaj la Turka) estas deveninta.

La plej novaj esploroj pri la rilatoj de la diversaj rasoj kaj lingvoj de Eŭropo kondukas al la konkludo, ke la deveno de la antikva fontalingvo (diverse nomita *Ursprache*, "*Arja Hindu-Germana, Hindu-Eŭropa*") estas produktita per la alprenado kaj aliformigado de ia Fina-Ugria dialekto per la ne-Aziaj rasoj de Eŭropo, antaŭ kelkaj jarmiloj.

En la antaŭhistoria periodo, antaŭ la deveno de la estantaj lingvoj de Eŭropo, estis en Eŭropo kvar tute malsimilaj rasoj kaj multaj gradoj de miksaĵo inter tiuj ĉi kvar rasoj.

(a). La granda blonda, long-kapa raso de la nordo, diverse nomita *Norda, Skandinava, Teŭtona, Germana, and Eŭropa*.

(b). La malgranda blonda larĝkapa Fin-Ugria raso de Norda Rusujo.

(c). La malgranda bruna rondkapa raso de centra Eŭropo, etendiĝanta de suda Rusujo, tra la Alpujo ĝis la Pireneaj montoj.

(d). La malgranda bruna long-kapa raso de Hispanujo, suda Italujo, kaj la Mediteranea insuloj.

Tiuj ĉi kvar rasoj, antaŭ ol ili kontaktiĝis kune, parolis tute malsimilajn lingvojn.

Sed la tempo alvenis kiam, pro la miksiĝo de la rasoj, novaj dialektoj deveniĝis, kaj de unu el tiuj ĉi dialektoj naskiĝis la fonta-lingvo de ĉiuj estantaj Eŭropaj lingvoj (krom la Baska, Hungara, Fina kaj Turka).

La regiono el kiu elmigris la Aziaj rasoj Fin-Ugria kaj Centra Eŭropa, estis la nordo kaj la sudo de Eŭropa Rusujo. Kiam tiu ĉi raso, migranta okcidenten renkontis la grandan blondan Nordan rason, tiu ĉi Eŭropa raso forlasis sian propran lingvon, kaj alprenis ian dialekton de antikva Fina aŭ Ugria lingvo, samtempe kreante el ĝi la novan Arjan dialekton laŭ la sama maniero per kiu, hodiaŭ, barbaraj rasoj aliformigas kaj simpligas niajn Eŭropajn lingvojn. Tiu ĉi Arja font-lingvo ekekestis plej kredeble en antaŭ-historia tempo en la lando antaŭe nomita la Reĝlando Pola. Ĝi disvastiĝis iom post iom al la okcidento al la nordo, al la sudo, kaj al la oriento. La aliaj rasoj de Eŭropo faris tion saman, kion estis farinta la norda raso. Ili alprenis la dialektojn de la nove kreita Eŭrazia lingvo, kaj ankaŭ, kiel la granda blonda raso de Norda Eŭropo, ili samtempe aliformigis ĝin. La raso de Centra Eŭropo estis ne tiel malsimila al la Fina raso, de kiu unu lingvo restas ĝis hodiaŭ—la Baska, kiu ŝajnas esti lingvo Ural-Altaika, aliformigita per kontakto en Francujo kaj Hispanujo, kun la norda Afrika, Mediteranea raso de suda Eŭropo.

Tiuj ĉi kvar grandaj rasoj de antaŭ-historia Eŭropo estas nun ĉie alprenintaj dialektojn devenintajn de la Arja font-lingvo. En nenia lando de Eŭropo ekzistas nun la antaŭa lingvo de la raso nord-Afrika-Mediterranea. Ni povas trovi

iliajn parencajn lingvojn nur en Afriko, la Berbera, la Libja, kaj la antikva Egipta. La lingvo de la norda raso estas tute malaperinta. Kia estis la forlasita lingvo de la granda blonda raso antaŭ la alpreno de la dialektoj de la Lapoj kaj Finoj, estas neeble diri, ĉar nenia formo de tiu ĉi lingvo ekzistas, kaj la rilato de tiu ĉi raso al aliaj rasoj de la homaro estas ankoraŭ mistero.

La aliformigado de la Fina-Ugria dialekto el kiu venis la Arja fontlingvo per la mikado de la rasoj, plej kredinde okazis sur la Polaj ebenlandoj, kaj de tiu ĉi centro estas radiintaj ĉiuj *Hindaj-Eŭropaj* lingvoj. Tiu ĉi rimarkinda antaŭhistoria dialekto iom post iom etendiĝis, kaj estis alprenata kaj ŝanĝata, ĝis iu ne klera en la komparanta lingvoscienco ne povas kredi, ke la Angla, la Hinda, kaj la Rusa lingvoj estas kreskintaj de unu kaj la sama lingvo.

La maniero de la evolucio de la antikva lingvo de Polujo estis el la unu en la multajn, kaj, kvankam la estantaj lingvoj de Eŭropo, Armenujo, Persujo, kaj Hindujo montras klare al la studento de lingvoj signojn de siaj devenoj, la diversiĝado en reciproke nekomprenablajn formojn de parolado estas jam okazinta en la malproksima estinteco, antaŭ ol la antaŭ-historiaj elmigrantoj el Polujo

estis multe antaŭirintaj en sia vojaĝo tra la Norda Germana ebenlando, aŭ en la arbarojn de la Karpataj montoj, aŭ sur la Sud-Rusajn stepojn.

En Polujo oni havis lingvon, por ĉiuj komprenblan, sed elmigrado kaj mikado kun aliaj rasoj baldaŭ aliformigis ĝin en dialektojn kaj lingvojn tiel malsamajn ke tiuj, kiuj parolis ilin, ekrigardis unu la alian kvazaŭ alilandulo, barbaro, malamiko.

Tia estas la sorto de tiu ĉi fama antikva lingvo de Polujo, la fonto de preskaŭ ĉiuj lingvoj de la Atlantica Oceano, ĝis la Golfo de Bengalo. Sed la Historio sin ripetis, kaj Polujo naskigas alian lingvon, lingvon komprenblan por ĉiuj, ESPERANTO, kiu ankaŭ etendiĝis de Oceano ĝis Oceano. Sed ĝia maniero de etendiĝado estas tute kontraŭa al tiu de ĝia antikva praavo. Ĝia sorto estas *redoni al ĉiuj unu komunan lingvon*, tiel longe perditan. Unu lingvo komprenbla por ĉiuj! Ĉiuj grandaj mondurboj enhavas siajn Esperantistojn. La lingvo uzata de Esperantisto ja estas komprenbla tra la tuta mondo. Ne grave kia estas la patrujo aŭ la nacieco de la persono alparolita. Antikve, oni vastigis la multajn el la unu. Nun oni reunigas la multajn en la unu!

## LA GRUO KAJ LA SIMPLANIMULO.

Hinda Fablo, tradukita de Guy H. Naylor.

En la Oriento loĝis simplanimulo, kiu iris unu tagon al siaj kampoj, kaj diris: "Mi semis antaŭ unu monaton; se la rikoltoj prokrastiĝus du monatojn pli longe, mi ricevos tri cent buŝelojn da greno. Sed mi estas rapidema, tiel, se mi rikoltus nun, mi kredinde ricevos almenaŭ unu cent buŝelojn."

Gruo, kiu aŭdis liajn vortojn, diris: "Se mi estus vi, mi havus ĉiujn tri cent buŝelojn tiun ĉi tagon mem."

"Kiel?" diris la simplanimulo.

"Nu," respondis la gruo, "vi provizis akvon en la akvujo por nutri la rikoltojn tri monatojn. Unu monato estas pasinta, tial sufiĉe da akvo por du monatoj ankoraŭ restas en la akvujo. Se vi malfermus la pordojn de la akvujo kaj lasus flui la akvon sur la kampojn, vi ricevus ĉiujn rikoltojn tuj."

"Ĉu vi estas certa, ke mi havos ĉiujn rikoltojn tuj?" diris la simplanimulo.

"Ho jes!" diris la gruo, "ne estas la plej malgranda dubo. Mia geografia sciado estas vasta, ĉar mi estas vojaĝinta tra granda parto el la mondo; tial vi povas dependi de mia mondvesta scio kaj sperto."

La simplanimulo tiam lasis flui ĉiun akveron sur la kampojn. La gruo invitis sian parencon, kaj unue ili kune manĝis ĉiujn grandajn fiŝojn postlasitajn en la akvujo, kaj poste, flirtegante super la kampoj, ili kaptis ĉiujn malgrandajn fiŝojn, kiuj estis elirintaj kune kun la akvo. Granda parto el la rikoltoj estis forbalaita; tio, kio restis, estis baldaŭ enfosita en la ŝlimo.

La simplanimulo sidis sur la bordo de la lago, kaj ploris, dirante, "La geografio de la gruo min ruinigis!"

"Mia amiko," diris la gruo, "mia geografio estis tiel bona kiel via aritmetiko."

"Estas tute same ĉu vi falas en la defluilon de tiu bordo, aŭ de tiu ĉi!"

## LETERO EL ĜENEVO.

Edouard Bernard.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en nia urbo la Internacia Filozofia Kongreso. Ĝi daŭris kvin tagojn kaj ricevis grandan sukceson ĉu pro la nombro de la partoprenantoj (ĉirkaŭ 300) ĉu pro la laboroj, kiuj estas prezentitaj. Mia intenco ne estas priskribi detale ĉiujn kunsidojn de la kongreso. Mi volas nur doni al la legantoj de THE ESPERANTIST kelkajn sciigojn pri la punktoj, kiuj povas ilin interesi.

La problemo de la lingvo internacia okupis la lokon, kiun ĝi meritis. En sia parolado ĉe la komenco de la kongreso S<sup>o</sup>. J. J. Gourd, efektiva prezidanto, aludis al tiu ĉi grava demando. Li memorigis, ke ĝi jam okupis la atenton de la filozofoj ĉe la unua filozofia kongreso en Parizo dum la universala Ekspozicio de 1900. Tiu unua kongreso estis elektinta S<sup>o</sup>. Couturat kiel delegito por ekzameni la demandon kaj raporti al la sekvanta kongreso. S<sup>o</sup>. Couturat prezentis sian raporton kaj konkludis la aliĝon de la kongreso al la Delegacio por la elekto de lingvo internacia. Mi plezurege ĉeestis ĉe la disputado pri la raporto de S<sup>o</sup>. Couturat. Tiu disputado okazis antaŭ multnombra publiko en la granda ĉambrego de la Universitato, kiun ni nomas tie ĉi "Aula."

Mi volas nur diri kelkajn vortojn pri la ĉarma paroladeto elparolita de S<sup>o</sup>. Ernest Naville, honora prezidanto de la kongreso, unu el niaj plej rimarkindaj gloruloj. Neniu Esperantisto nescias ke S<sup>o</sup>. Ernest Naville prezentis Esperanton antaŭ kvar jaroj ĉe la Franca Instituto. Tiu respektinda filozofo, kiu havas okdek-ok jarojn, estas fervora partiano de nia kara lingvo. Pro sia granda aĝo li ne povis eklerni Esperanton, sed li komprenas sufiĉe ĝian esencon por esti fervora aprobanto. La granda aŭtoritato, kiun ĝuadas S<sup>o</sup>. Naville, estas tre grava kaj tre precioza helpo por nia afero. Mi aldonas ke li estas honora prezidanto de la Svisa Esperanta Societo, kaj ke propaganda broŝuro ĵus estis eldonata sub liaj aŭspicioj.

Mi diris do, ke S<sup>o</sup>. Naville faris ĉarman paroladeton ĉe la filozofia kongreso. Li montris la gravecon de la demando de lingvo internacia kiu ĉiutage pligrandiĝas. Post ke li estis parolinta je la historia vidpunkto, S<sup>o</sup>. E. Naville esprimis sian admiron por la mirinda verko de nia Majstro

D<sup>o</sup>. Zamenhof. Ĉio ĉi estis parolata kun la plej granda konvinko kaj ankaŭ tre sprite.

"Kiam, diris S<sup>o</sup>. Naville, oni parolis al mi la unuan fojon pri Esperanto kaj ĝiaj mirindaj ecoj, mi restis iom skeptika, malfidanta pri la entuziasmo de miaj kunparolantoj; ĉar tiuj lastaj al mi diris, ke la fama filologiisto Max Müller estis skribinta, ke Esperanto estas la plej rimarkinda el ĉiuj artaj lingvoj, mi volis certigi pri tio, kaj mi turnis min rekte al Max Müller. Max Müller al mi respondis: 'Jes, mi skribis tion.' Kaj S<sup>o</sup>. Naville aldonis, ke kiam filologiisto kiel Max Müller estis doninta sian aprobon al Esperanto, neniu havis de nun la rajton ridi." "Jam," diris ankoraŭ S<sup>o</sup>. Naville, "junuloj venis peti min, por ke mi akceptu la econ de honora prezidanto de la Svisa Esperanta Societo; mi respondis al ili, ke mi ne povas akcepti tiun titolon, tial, ke mi ne povas labori laŭ aktiva maniero por la disvastigado por Esperanto . . . sed ili insistis; mi tiam serĉis en la Akademia vortaro kia estas la signifo de la vorto 'honora' kaj mi trovis: 'honora'—tiu vorto servas por nomi la personojn kiuj portas honorantan titolon ne plenumante oficon. Tio estis mia situacio kaj mi akceptis. . . ."

Estas neutile diri al vi ke la aŭdantaro tre interesiĝis je la parolado de nia respekta honora prezidanto, kiu estis ekstreme aplaudata.

Mi ne devas forgesi malgrandan detalon. Antaŭ ol paroli S<sup>o</sup>. Ernest Naville disdonis, li mem, al ĉiuj ĉeestantaj filozofoj propagandajn broŝurojn nove publikigitajn, kies la aŭtoro estas S<sup>o</sup>. Privat, la juna redaktoro de la *Juna Esperantisto*. Oni ne povis vidi, ne estante tuŝata, tiun eminentan maljunulon eltirantan el sia poŝo broŝuron por ĝin doni al ĉiuj, kiuj alproksimiĝis al li.

Post la disputado pri la lingvo internacia, al kiu S<sup>o</sup>. Stein, profesoro ĉe la Berna Universitato, favore partoprenis, S<sup>o</sup>. Couturat petis la aliĝon de la Kongreso al la "Delegacio." Tiu aliĝo fariĝis unuvoĉe.

Ni, Genevanoj, ni povas ĝoji, ke la kongreso okazis en nia urbo, ĉar ĝi altiris la atenton de la publiko pri la lingvo internacia kaj aparte pri Esperanto. Tiel espereble nia propagando estos faciligata.

"Patro, kio estas reĝo?"

"Reĝo, mia knabo, estas persono kies vorto estas leĝo, kaj kiun ĉiu devas obei."

"Patro, ĉu la patrino estas reĝo?"—(9929).

## THE PROGRESS OF ESPERANTO IN GREAT BRITAIN AND ABROAD.

*The contents of this section are supplied by the Hon. Sec. of the London Esperanto Club, who invites all Esperantists to send monthly reports of the spread of the International Language in their districts. Communications must reach 14, Norfolk Street, London, W.C., before the 8th of each month.*

*The British Esperanto Association.*

The first Council of the Association took place on Monday, October 24th. The President, Colonel Pollen, C.I.E., took the chair. Twelve of the Council were present, besides the executive officers. It was decided that the Council should use the power given them of appointing Sub-Committees for various purposes, and to co-opt as Councillors several people whose aid would be of value on such Sub-Committees. Messrs. Cowper, Millidge, Motteau, and Rolston, and Miss Schafer were then elected. It was decided to establish The British Esperanto Association in offices at 14, Norfolk Street, Strand, and appoint an Assistant Secretary at the rate of £26 per annum. A Sub-Committee, viz., Mr. Cowper (of Deal), Mr. Maitland, and Mr. Millidge, was appointed to draw up the Rules of Association, and the Rules, when drafted, were to be submitted to the Council for approval.

It was also resolved that Dr. Lloyd, Mr. Rhodes, and Mr. Bullen should be asked to collaborate in formulating, for submission to the Council, a Scheme and Rules for Examinations as to proficiency in Esperanto.

A Publication Sub-Committee was also arranged.

A meeting of the Executive Committee took place on November 7th, when Miss Lawrence, the representative of the London Club, formally handed over its store of books, and goodwill, and its affiliation fees, announcing that this abdication of its prestige was made without asking for any *quid pro quo*, and simply as an act of loyalty to the central body. Miss Lawrence begged that the fact might be entered on the minutes that the London Club had done this; and that it had borne the heavy cost of preparing for the foundation of The British Esperanto Association. This was considered a reasonable request, but it was pointed out that no country Councillor was present to second the motion proposed by Mr. Maitland, of the West London Group. It was therefore seconded by Mr. Gill, of the Acton Group.

The Committee also decided that the election of Fellows of the Association must be left to the consideration of the full Council, and that no immediate action could be taken in the several cases where applicants had forwarded subscriptions accompanied by requests that the senders might be elected Fellows of the B.E.A. It might be pointed out here that, according to the draft Rules, "The

Council are empowered to elect from the Members a limited number of Fellows, who have proved themselves to be expert Esperantists, and who are willing to pay 5s."

It was announced with regret that W. Whitebrook, Esq., would be unable, owing to the numerous professional calls on his time, to accept the Hon. Treasurership. The Committee expressed their heartfelt sense of the loss this meant to the Association, and elected Harald Clegg, Esq. (the Hon. Secretary), to fill the position of Hon. Treasurer also. All subscriptions and donations should, therefore, be addressed to Mr. Clegg, at the offices of the Association:—14, Norfolk Street, Strand, London, W.C.

*Group News.*

The *Acton Group* reports a very successful meeting recently, at which the veteran Esperantist, Miss Warlow, was unanimously elected President. Miss Warlow is the first lady President of any British Group. Those who know her are delighted at this fitting choice. The Hon. Secretary, Mr. E. J. Gant, Ivy Dene, Cumberland Road, Hanwell, will gladly supply information, and intending Members will be heartily welcomed. The classes are held in the South Acton Schoolrooms.

From *Aberdeen* comes the news that the Committee of the Chamber of Commerce have unanimously agreed that if Mr. Christen desires to give another lecture on the subject of Esperanto, the Chamber's support will be given to the meeting. The Committee were glad to know that Mr. Christen "was advocating the popular study of this new commercial language, which had been taken up in many parts of England and Scotland, and was so well known on the Continent." The Group meetings are held in the studio of Mr. Hector, and the Hon. Secretary is Mr. Donaldson S. Rose, M.A., 259, Union Street.

The *Brixton Club* is ever energetic. It is forming a circulating library, and subscribes to five magazines. It holds its meetings on Tuesdays, at 8 p.m. Members are invited to bring friends, and Mr. Eagle, 21, Kellett Road, will be pleased to give information.

Canon Lonsdale has consented to become President of the *Corbridge Group*. The Membership is large for the size of the village, and this is surely owing to the energetic past and present Secretaries, Miss Bauer and Miss Bickell.

At *Battersea*, Mr. A. Lee, 2, Cupar Road, has

organised a regular campaign. The meetings are at the Latchmere Baths on Tuesday, at 7.30.

The *Ilford Group* meets at the house of Mr. Jeffrey, 42, Park Road. One of the Members of this Group learnt Esperanto so quickly that after 14 days he was able to write a clever historical description of an old town.

The classes at *Liverpool University* are held on Wednesday, at 7.30, by Dr. Lloyd, who is preparing the Rules for Examinations.

In *Leeds* the classes are held at the Northern Institute on Saturday evenings, at 8.30 p.m. The visit of Mr. Rhodes in October was much appreciated. Between 70 and 80 people attended the lecture, many afterwards joining the Club. To arrange for such lectures will be in the future one of the important duties of The British Esperanto Association.

The Rev. E. Atkins has placed a room in the Working Men's College at the disposal of the *Leicester Group*. Mr. F. Mugglestone, 61, Bonsall Street, who is the Hon. Secretary, will gladly give information.

*Newcastle* does not mean to be content with one gathering. The classes at 29, Grainger Street, are held on Wednesdays, at 7.30, and a special elementary class for ladies at 10, Mosley Street, on Wednesday evenings, from 7 until 9 o'clock.

Mr. Korth, of *Swansea*, reports a rather amusing objection to the use of the Free Library for an Esperanto class. A Committee Member objected because "Esperanto is so awfully difficult." What kind of study is favoured in Swansea if the height of difficulty is measured by Esperanto? Inquirers will be gladly answered by Mr. Oswald Korth, 1, Kensington Terrace, Swansea.

Mr. S. E. Hunt, Selsley Road, Woodchester (Glos.), would like to hear from anyone in his neighbourhood interested in Esperanto.

#### *London Classes.*

*Monday*.—Club Café, 5, Bishopsgate Street Within. Tea at 6 o'clock; at 7 the party adjourns to 100, Gracechurch Street, to rooms kindly placed at their disposal by the Remington Typewriter Company.

*Monday*.—Students' class at 7.30. Conducted by Mr. Motteau, at the rooms of the Ethical Society, 19, Buckingham Street, Strand.

*Tuesday*, 6 to 8.—71, High Holborn. Room kindly lent by Messrs. Hatchard and Castarede. Those desiring to join should write to the Hon. Secretary, Mr. C. F. Hayes, 48, Swanage Road, Wandsworth.

*Tuesday*, 8.30.—The Co-operative Brotherhood Trust have a meeting of "Clarionites." Hon. Secretary, Mr. Goode, 37, Newington Green Road.

*Wednesday*.—German Club, Charlotte Street, Fitzroy Square. For particulars send stamped envelope to Miss A. Schafer, 8, Gloucester Crescent, Regent's Park.

*Thursday*.—Cusack's Institute, White Street, near Moorgate Street Station. Room kindly lent by the Principals. Beginners, 6.15. Advanced, 7.15.

*Friday*, 6.30.—Enterprise Club, Petersburg House, Leadenhall Street. For lady clerks and secretaries. This class is the result of a lecture given to Members of the Club by Miss Schafer. The audience was much interested in the discussion as to the utility and facility of Esperanto. Much amusement was caused when the speaker recited a few sentences in Esperanto, the meanings of which were easily guessed by the ladies present.

The veteran artist, Felix Moscheles, desiring to practise speaking, would like to talk with a few Esperantists in his own beautiful home, 80, Elm Park Road, Chelsea. About twilight would be a good time.

The above classes are free, but, as mentioned last month, a series of lessons by a skilled Esperantist can be arranged for by applying to the Secretary of the School of Esperanto, 93, Chancery Lane, W.C.

#### *Newspapers.*

The articles and letters commenced the 27th August in *La Chronique* (29, Bessborough Street, London) have continued every week since. The arguments of M. Hamonet, our keen antagonist, may be summed up in the formula we know so well: "An artificial language is so unnatural"; and, "Esperanto, if it should be successful, will displace all the national tongues, and Shakespeare, Goethe, Victor Hugo, Tolstoy, become just 'memories'; for boys (and men) are prone to idleness, and Esperanto is so easy that of course they will prefer it to their own tongue." Is this "approval" in disguise? The splendid articles in our favour by MM. Michaux, Bastien, Capé, Lefèvre, and a member of the French Academy seem waste of energy after the account of his provisions given by our adversary, M. Hamonet; for in their wildest dreams these gentlemen never supposed that an Englishman would prefer Esperanto to English.

The *School World* has at last spoken, and to some purpose. In the November number Mr. Mathews, of Rochester, after an exposition of the structure and uses of Esperanto, and a comparison with Volapuk, argues that for a large number of pupils in our schools the study of Latin, French, and German has little practical value. He would substitute Esperanto for the

lower forms, because (1st) more time will be set free for other subjects ; (2nd), the pupils will get a good training in the correct meaning of words, and will have such a copious stock of roots that they will be able to overtake students in other modern languages who have not had their advantages. He considers Esperanto more valuable than Latin as a means of training. An interesting article from the pen of Dr. Martyn Westcott, in the November number of *Womanhood* (5, Agar Street, Strand), is the first of a series which the Editress, Mrs. Ada Ballin, intends to carry on in future numbers. There will be a monthly lesson ; also short story competitions, prizes, etc., etc. ; and it is hoped that a *Womanhood* Club will be formed. I trust Mrs. Ballin will have great success, for, oddly enough, the majority of Esperantists are men ; when once their wives, sisters, and daughters take up the matter, "We shall see what we shall see."

#### *Foreign News.*

First in importance are the preparations for the Congress in Boulogne next year. Dr. Zamenhof, having consented to preside, has also intimated his wish that this should be a Congress in which every Group in the world should be represented, but the Boulogne Group, unaided, could not organise so stupendous an affair ; even the comparatively small gathering at Dover last summer cost more than that Group could rightly afford ; M. Michaux therefore calls for aid from all quarters. The Société Française p.p. Esperanto has, as usual, been the first to answer. It announces a contribution of 200 francs, and more, if possible. What will Great Britain do ? Many have suggested that Dr. Zamenhof should "come out of his shell." Now he means, if possible, to do so. We must see that he has a good welcome. Will Esperantists send suggestions to the Hon. Secretary of The British Esperanto Association as to how much we should contribute ?

There is to be a great Esperanto Exhibition in Algiers in March, and Captain Capé, 17, Boulevard, Gambetta, earnestly hopes that literature of all kinds may be lent him. Circulars in Esperanto, articles of commerce with Esperanto labels, books, journals, post cards, propaganda leaflets, etc., etc.

At the Grenoble Congress M. Bolack occupied some hours in describing the invention, the Langue Bleue, to which he has devoted so much time and money, but he at length confessed that he could not hold a conversation in it for even five consecutive minutes.

It is stated in this month's *Esperantiste* that, owing to a fire in his house, Mr. Geoghegan, the first English Esperantist (it is supposed), has lost

the whole of his valuable collection of letters, post cards, and books ; this means that he has lost the addresses of all his correspondents as well. Any such who read these lines are asked to send him their news to East Sound, Washington County, U.S.A. Truly every Esperantist will condole with him upon this loss.

On the 19th October an amusing critique appeared in the *Glasgow Evening Times*. Under the heading of "Shreds and Patches" its editor attacked Esperanto in diatribe against Mr. W. T. Stead. This naturally provoked the retort on the 20th that Esperanto was not a new untried experiment which Mr. Stead was trying to boom, and that there was no earthly reason for connecting the man and the language, except that Mr. Stead is enthusiastic and open-minded, and Esperanto as a language is approved of by such. Mr. Wallace, Mr. Buchanan, Mr. Rhodes and others joined in the fray, and on November 2nd an amusing skit headed "Shredoji kaj Patchegaj" appeared, in which the writer started by saying "Mi esperas ke Mi povos uzi la Internacia Lingo Esperanto por tui artikolon," but he found it better to stick to English. Of the propriety of this there could be no question, seeing the writer knew only twelve words of Esperanto. He then goes on to classify the thirty-seven letters he had received, announcing that, evidently, "any craft that appears within extreme range of Esperanto must be a hostile torpedo boat." The correspondence apparently dwindled after this date ; but one singular fact with regard to it appears to be that Glasgow people themselves were not sufficiently interested to enlarge the Glasgow group to any conceivable extent, the exact opposite to Aberdeen, Bedford, etc.

The November number of the *Note-Book* (every issue gives Esperanto matter) contains a very interesting report of the General Meeting of the British Esperanto Association, together with the usual interesting lesson, and an account of an amusing game by Mr. Hugon.

The foreign Esperanto journals have been especially interesting of late. Many of them have contained articles on "Holidays in Esperantoland." Most of the gazettes are also improving in appearance, which must also be taken as a good sign of progress and increasing circulation.

Several New Zealand papers have been discussing Esperanto of late. *The Voice*, a widely-read and attractive monthly, led the way, and Otago and Southland papers have followed on, thanks to the energy of Mr. Field.

## OKAZETO VENEZIA.

Originale verkita de D. H. Lambert, B.A. (9660).

Pasiginte la Paskon en Romo, mi forveturis Venezion por ĝui tie la trankvilecon nur atingeblian en urbo, kie la piedfrapado de ĉevaloj kaj la rulsonado de radoj neniam igassin senti.

Sed kiel priskribi la Veneziajn glorojn! Kiel per ordinaraĵoj mi povos, ne tro grandigante, konatigi la eksterordinarajn mirindaĵojn de tiu ĉi vidinda urbo, la idealo de la romanca historio, tronata sur sia centinsularo! Kie mi serĉos egalulinon al la Reĝino de la Adriatiko, kun ŝiaj palacoj, ŝiaj gondoloj ŝiaj kanaloj, la "*flumina antiquos praeterlabantia muros*" de Virgilio, kaj kun ŝia unu placo, kiu kompare kvazaŭ malgrandigas ĉiujn aliajn!

Kia vizitanto al Venecio ne tralegis ŝian gloran historion, temon tiel kortuŝantan eble pro ĝiaj rakontoj pri triumfoj kaj malfeliĉaĵoj, la ŝanĝemaj bataĵoj de la sorto, kiel tiu de mem Grekujo! Kiam, jen sur la randaĵo de malespero kaj forlasanta je ĉiam la scenojn de tiomaj ĉagrenaĵoj, ŝi rekuraĝigis kaj enspiris novan vivon el la cindroj de la malĝojeco.

Certe la nomoj de Contarini, Pizano, Zeno kaj Chioggia (Kioĝja) elvokas admireman sentadon tiel fortan, kiel tiu pri Pausanias kaj Miltiades, pri Salamis kaj Marathon.

Kaj, se eĉ en la mondo de la belartoj kaj beleco Venecio preskaŭ ne povas sin antaŭmeti kiel komparindan kun la fieraj sanktejoj kaj la diaj elpensajoj de la Grekaj skulptistoj, ŝia gloro tamen ne malpli ol ŝia dekliniĝo kaj falo, elvekgigas, mi opinias, egale profundan intereson.

Protektite de la ostoj de la sanktulo Marko, la respubliko povis prezenti multimegan frunton al Doriaj minacoj, kaj Barbarasaj tondriroj, senpovaj, malgraŭ la plej terura frenezeco, tremigi la barkon, kiu sciis surrajdi la ondegojn meze de mugadanta alilanda blovegado.

En la *Hotelo Victoria* mi trovis loĝejon tre komfortan, kaj, post rondtabla-vespermanĝo, mi ekiris por kunigi kun la aro da akvofestantoj sur la Granda Kanalo.

Dum la gondolo glitadis senbrue preter la silentaj palacoj—la akvo lumigata jen de la lunradioj, jen de ia pendanta gaslampo,—renkontiĝante kun fantomoj nigrevestitaj kiel ĝi mem, antaŭenirigata de la kvietga gondolisto, tra ĝia vojiro misterega, la ligilo de la sorĉeco ŝajnis al mi plenita.

La trompita imago reflugis al la jarcentoj kiam romanco kaj amsekreteco ekscitis multajn krimojn, kiujn la profundaĵoj de tiuj akvoj povus malkovri!

Alveninte al la signita ejo mi alproksimiĝis al la diverskolora boatego kun ĝiaj lumdonantaj Ĥinaj lanternoj, balanciĝantaj antaŭe kaj poste, kie sidadis la kantantoj kun siaj belsonaj muzikiloj, kies notoj, per dolĉe modulantaj akordoj, kiuj akompanis la voĉojn, elravis la orelojn de ĉiu aŭdanto, kaj malgrandigadis iom post iom tra la laguno.

Tuj kiam mi revenis gastejen, preta kuŝigi post la tagaj laboroj, la jena interparolado okazis:

"La sinjoro bonvolos pardoni, ke necesiĝas ŝanĝo de dormoĉambro."

"Sed miaj valizoj kaj la tuta vojaĝilaro jam suprenportigis en mian ĉambron."

"Sen malfacileco oni translokos ilin en alian."

"Kion vi proponas provizi al mi? Almenaŭ interne de la hotelo, mi esperas!"

"Certigu vin pri tio, sinjoro. Mi havas ĉambron kiu al vi plaĉos, kaj la pakajoj jam tie sin trovas."

Suprenirinte tien, mi eniris en ĉambregon lumigitan per du grandaj kandelabroj ĉe la pli malproksima fino, meze de mallumo, kiun ili malfacile kontraŭstaris.

La litego, ĉirkaŭate de nigraruĝaj kurtenoj kaj enmetite en angulon prezentis neniel aperon allogi ripozon.

"Sendigu tien ĉi," mi diris al la gastejestro, "noktomanĝeton; mi kutimas preni malpezan manĝaĵon antaŭ ol ripozi."

Atendante la manĝilon, mi zorge ekzamenis la tutan salonon, esplorante la grandnombrajn ŝrankojn kaj kestegojn, kiujn la ĉambro enhavis.

La muroj estis kovrataj de tapetoj, kiuj figuris batalantajn Krucistojn, kies helaj plumoj, standardoj kaj armaĵoj, kie rebrilis la sunradioj, kontrastis kun la pentrindaj postscenoj de monto kaj arbaro.

Kvankam la vetero estis varma, mi decidis ekbruligi fajreton por heligi la malĝojan atmosferon de la salono: kaj altirinte apuden seĝegon, mi eklegis romanon, kiun mi okaze kunportis kun mi.

Post la manĝaĵo mi sentis min dormema, sed ne dezirante pasigi la nokton sidante mi decidis min senvesti por kuŝiĝo.

Sed la silento kredeble malhelpis min maldormi, kaj kontraŭvole mi ekdormetis.

Teruraj sonĝaj fantazioj tamen vin vekadis, kaj mi estis levigonta pretigi min por la lito, kiam la granda spegulo, kiu pendis kontraŭe, vidigis al mi homan kapon elrigardanta super mia seĝego.

Antaŭ ol mi povis rekonsciiĝi, por tiel diri, post la mirego kaŭzita per tia neatendita aperaĵo, kiu subite neniĝis en aeron, miaj okuloj terure sin fiksadis sur la malantaŭa tapeto proksima de la kapkuseno de la lito.

La tapeto flankentirata malrapide mallegis la vizaĵojn de du viroj, mallaŭte interparolantaj, sed elĵetantaj minacajn rigardojn, dum unu per la maldekstra mano montris al la alia mian terurigitan figuron.

Ili portis vestojn antikvajn, kun longaj glavoj pendantaj de zonoj ĉirkaŭantaj la kokson.

De iliaj senkaskaj kapoj bukloj kovris iliajn ŝultrojn.

Post iom da tempo, kiu al mi ŝajnis centjaro ili faris signojn a'paŝi en la ĉambron por min ataki. . . . Mi provis kriegi . . . faletis . . . kaj svenis.

## LA TREZORO EN LA ARBARO.

Fino de la rakonto de H. G. Wells. Tradukita (laŭpermeso) de Martyn Westcott.

Evans tremetis. "Ŝajnas preskaŭ malvarme ĉi tie, post la brulego ekstere."

"Mi esperas ke ni rekte iras," diris Hooker.

Post nelonge ili vidis, malproksime antaŭe, interspacen en la malhela mallumeco, kie la blankaj radioj de la varmega sunlumo eniris en la arbaron. Tie ankaŭ estis brile verda subkreskaĵo, kaj koloraj floroj. Tiam ili aŭdis la sonon de la akvofluo.

"Jen la rivereto. Kredeble ni estas nun apud ĝi," diris Hooker.

La kreskaĵaro estis densa apud la riverbordo. Grandaj kreskaĵoj ankoraŭ sennomaj, kreskis inter la radikoj de la grandaj arboj, kaj prezentis bukedojn de vastaj verdaj folioj al la strio da ĉielo. Multaj floroj, kaj kreskaĵo kun brila foliaro, alkroĉis sin al la nekovrataj trunketoj. Sur la akvo de la larĝa, trankvila lageto, malsupren sur kiu la trezorserĉantoj nun rigardis, fosis grandaj ovalaj foliegoj, kaj kvazaŭvaksaj duberozokolora floro, ne malsimila al akvo-lilio. Pli antaŭen tie, kie la rivereto kurbiĝis for de ili, la akvo subite ŝaŭmis kaj bruiĝis kaskade.

"Nu?" diris Evans.

"Ni iom flankiĝis," diris Hooker. "Tio estis atendota."

Li sin turnis, kaj rigardis en la malhelajn malvarmetajn ombrojn de la silenta arbaro, malantaŭ ili. "Se ni iros iom supren kaj malsupren, laŭlonge la rivereto, ni kredeble atingos ion."

"Vi diris——" komencis Evans.

"Li diris, ke estas ŝtonaro," diris Hooker.

La du homoj rigardis unu la alian dum momento.

"Ni unue esploru iom malsupren," diris Evans.

Ili antaŭeniris malrapide, scivole ĉirkaŭrigardante. Subite Evans haltis. "Kio, je la diablo, estas tio?" li diris.

Hooker sekvis per la okulo lian montrantan fingron. "Io blua," li diris. Ĝi vidiĝis ĵus kiam ili atingis la supron de malgranda altaĵo de la tero. Tiam li ekkoniĝis tion, kio ĝi estis. Li subite

antaŭeniris rapidpaŝe, ĝis ke videbliĝis la korpo apartenanta al senpova mano kaj brako. La mano ankoraŭ rigide tenis la ilon, kiun ĝi estis portinta. La aĵo estis Ĥino, vizaĝo malsupre. La malzorgeco de la kuŝmaniero estis plene klariga.

La du homoj pliproksimiĝis, kaj staris, silente rigardante tiun ĉi senvivan korpon malbonaŭspicie. Ĝi kuŝis en spaco inter la arboj. Apude estis fosilo, laŭ la Ĥina modelo, kaj pli malproksime kuŝis disĵetita-ŝtonaro, proksime de novefosita truo. "Iu estas alveninta ĉi tie antaŭ ni," diris Hooker, iom tusante en la gorĝo.

Kaj tuj Evans ekblasfemis kaj frenezigiĝis, kaj piedtrapegis la teron.

Hooker blankiĝis, sed diris nenion. Malrapide li antaŭeniris al la kuŝanta korpo. Li vidis, la kolo plidikiĝis kaj estis purpura, kaj la manoj kaj maleoloj estis ŝvelataj.

"Pa!" li diris, kaj subite deturnis sin, kaj iris al la elfosejo. Li ekkriis surprize, kaj kriegis al Evans, kiu malrapide sekvis lin: "Simplulo! Estas tute bone. Jen ĝi ankoraŭ estas." Tiam li denove turnis sin, kaj rigardis la mortintan Ĥinon, kaj poste la truon.

Evans rapidis al la truo. Jam duone elfosita de la malbonŝanca malfeliĉulo apude, kuŝis nombro da malbrilaj flavaj baroj. Li kurbiĝis en la trueto kaj, forbalaŭtante la teron per la manoj, li rapide eltiris unu el la multepezaj masoj. Tionfarante, malgranda dorno pikis lian manon. Li forprenis la maldikan dorneton per la fingroj, kaj levigis la fandaĵon.

"Nur oro aŭ plombo povus pezi tiele," li diris triumfe.

Hooker ankoraŭ rigardis la mortintan Ĥinon. Li embarasiĝis.

"Li ruze alvenis tien ĉi antaŭ siaj amikoj," li fine diris. "Li venis tien ĉi tute sola, kaj ia venena serpento mortigis lin . . . Mi volus ekkoni kiamaniere li eltrovis la lokon."



Evans staris kun la fandaĵo en la manoj. Sed neniel grava estas la morto de Ĥino. "Ni devos porti tiujn ĉi al la ĉeflando peco post peco, kaj enterigi ilin tie dum mallonga tempo. Kiel ni transportos ĝin al la kanuo?"

Li demetis sian jakon, kaj etendis ĝin surtere, kaj ĵetis du aŭ tri or-fandaĵojn sur ĝin. Iom pli poste, li ekvidis, ke alia dorneto pikas lian haŭton.

"Tiu ĉi estas tiom, kiom ni porti povos," li diris. Tiam subite, kun stranga ekkoloriĝo, "Kion vi rigardadas?"

Hooker sin turnis al li. "Mi ne povas suferi . . . lin," kaj li klinis la kapon al la Ĥino.

"Ĝi tiel similas al . . ."

"Malsaĝeco!" diris Evans. "Ĉiuj Ĥinoj similas unu alian."

Hooker rigardis sur lia vizaĝo. Ĉiaokaze mi tuj enterigos tion antaŭ ol mi helpos pri tiu ĉi afero."

"Ne estu malsaĝulo, Hooker!" diris Evans. "Lasu resti tiun putriĝantaĵon."

Hooker ŝanceliĝis, kaj tiam liaj okuloj atente ekzamenis la brunan teron ĉirkaŭe. "Ĝi ial timigas min," li diris.

"La afero estas," diris Evans, "kion fari pri tiuj ĉi fandaĵoj. Ĉu ni reenterigos ilin ĉi tie aŭ ĉu ni portos ilin per la kanuo trans la mar-kolon?"

Hooker pripensis. Lia konfuzita rigardado vagis inter la altaj arbtrunkoj, kaj supren en la malproksiman verdaĵaron sunlumigatan. Li tremetis denove, kiam liaj okuloj haltis ĉe la bluvestita Ĥino. Li serĉe rigardis en la grizan profundaĵon inter la arboj.

"Kio okazis al vi, Hooker?" diris Evans. "Ĉu vi perdis vian saĝon?"

"Ni forprenu la oron de ĉi tie iel!" diris Evans.

Li manprenis la finojn de la jaka kolumo, kaj Evans tenis la kontraŭajn angulojn, kaj ili levigis la mason. "Kien?" diris Evans. "Al la kanuo."

"Estas strange," diris Evans, kiam ili estis antaŭenirintaj nur kelkajn paŝojn, "sed miaj brakoj ankoraŭ doloras pro la remado." "Malbenu!" li diris. "Sed ili ja doloras. Mi devas halti."

Ili metis la jakon teren. La vizaĝo de Evans estis pala, kaj ŝviteroj elstaris sur lia frunto. "Estas ial senaere en tiu ĉi arbaro."

Poste, kun subita ŝanĝo al neracia kolero: "Kio bona tie ĉi atendi la tutan tagon? Helpu mi diras! Vi nenion faris krom revii, de la tempo kiam ni ekvidis la mortintan Ĥinon."

Hooker fikse rigardadis la vizaĝon de sia kunulo. Li helpis levi la fandaĵ-portantan jakon, kaj ili antaŭeniris eble cent jardojn silente. Evans komencis forte spiri.

"Ĉu vi ne povas paroli?" li diris.

"Kion vi havas?" diris Hooker.

Evans faletis, kaj tiam, kun subita malbeno,

ĵetis la jakon for de li. Dum momento li rigardadis je Hooker, kaj tiam, kun ĝemo, li ekkaptis sian propran gorĝon.

"Ne alproksimiĝu al mi," li diris, kaj li iris sin apogi al arbo. Tiam, per pli forta voĉo, "Mi resaniĝos post minuto."

Post iom, lia tenado al la trunko malfortiĝis, kaj li malrapide glitis malsupren je la arbotrunko, ĝis li fariĝis senpova amaso ĉe ĝia radiko. Liaj manoj konvulsie kunpremiĝis. Lia vizaĝo tordiĝis pro doloro. Hooker alproksimiĝis je li.

"Ne tuŝu min! Ne tuŝu min!" diris Evans, per sufokanta voĉo. "Metu la oron ree sur la jakon."

"Ĉu mi ne povos fari ion por vi?" diris Hooker.

"Metu la oron ree sur la jakon."

Dum Hooker levis la fandaĵojn, li sentis piketon, sur la fingrega radiko. Li rigardis sian manon kaj ekvidis maldikan dornon, eble du colojn da longeco.

Evans elpuŝis senvortan krion, kaj turniĝis.

La makzelo de Hooker falis. Li rigardis la dornon dum momento per plivastiĝintaj okuloj. Tiam li rigardis Evans, kiu nun kunkurbiĝis sur la tero, la dorso fleksiĝante kaj rektiĝante konvulsie.

Tiam li rigardis tra la kolonoj de arboj kaj la interpleksaĵo de ŝnuraj tronketoj, al la loko kie, ĉe la malhela griza ombro, la bluvestita korpo de la Ĥino malklare ankoraŭ vidiĝis. Li pripensis pri la malgrandajn streketojn sur la karta kojno, kaj tuj li komprenis.

"Dio min helpu!" li diris. Ĉar la dorsoj estis similaj al tiuj, kiujn la Djakoj trempas en venenon kaj uzas en siaj bloviloj. Li nun komprenis kion signifis la certeĝeco de Ĉang Haj pri la senriskeco de lia trezoro. Li nun ja komprenis tiun grimacon.

"Evans," li ekkriis.

Sed Evans nun estis silenta kaj senmova, krom pri terura spasma moveto de siaj membroj.

Profundega silentado regis en arbaro.

Tiam Hooker komencis furioze suĉadi je la malgranda rozkolora makulo ĉe la radiko de sia fingregi—suĉanta por kara vivo mem. Post nelonge li eksentis strangan doloron ĉe la brakoj kaj ŝultroj, kaj la fingroj malfacile kurbiĝis. Tiam li komprenis, ke la suĉado neniel utilos.

Subite li ĉesis, kaj, sidante apud la fandaĵaro, kaj apogante la mentonon sur la manoj, li fikse rigardadis la tordiĝintan sed ankoraŭ movantan korpon de sia kunulo. La grimaco de Ĉang Haj denove envenis en lian memoron. La malakra doloro etendiĝis al lia gorĝo kaj malrapide plifortiĝis. En la malproksimaĵo super li, ventetomovigis la verdaĵon, kaj la blankaj florflietoj de ia nekonata kreskaĵo malsupren flirtadis tra la mallumeco.

## KNABETO.

Originale verkita de Edward Metcalfe,  
M.A. (Oxon).

La vivo estis ĝoja rev'  
Ĉar estas mi edzeto,  
Sed min alvenis dolĉa dev'  
Fariĝis mi patreto.  
Ĉar vivas knabo en la kor'  
Mi estas kortegano ;  
Kaj riverencas kun ador'  
Al Sinjor' la Infano.  
De tron' lulila regas li  
La tiranega eto ; .  
Kaj kuras pro infana kri'  
Patrino kaj Patreto ;  
Li ion vidas, ploras ; ĝi  
Fariĝas lia havo ;  
Al Sinjor' la Infano mi  
Nun estas lia sklavo.  
"Ni rigardegu !" En okul'  
Vidiĝas vidindaĵoj  
"Ni duobligas !" — "Nesagul'  
Jen veraĵ infanaĵoj !"  
Jen veraĵ infanaĵoj ! — Ho !  
Valoras pli ol oro  
La font' de tiu infanaĵ'  
La ĝoj' de mia koro.

## AL FUMAMANTOJ.

(*Laŭ Irlanda ario "Nora Kreina"*).

Ben Elmy.

Se doloras nia kor',  
Se ĉagrenas sin la cerbo,  
Jen konsol' en tia hor' —  
Nikotina ĉarma herbo !  
Ĉiopova la rimed',  
Freŝa pli ol monta pino,  
Pli odora ol resed'  
Estas rava Nikotino !  
Venu, fumo de nektar' !  
Elspiraĵo de feino,  
Vera ĝojo de l' homar'  
La fidela Nikotino !  
Ĉar, per kara nia pip',  
Per cigar' aŭ cigaredo,  
Sur la tero, sur la ŝip',  
Neniĝas ĉia tedo ;  
Kaj en kiu ajn sezon',  
Glaciiga aŭ varmega,  
Ni paciĝas laŭ bezon'  
Per la Nikotino flega.  
Do, en vintro aŭ somer',  
Ĉiam, ĉie, kaj sen fino,  
Je mateno, je vesper',  
Adoriĝas Nikotino !

## MUŜOFIŜOBIRDORATOKATOHUNDO.

Originalaĵo de Clarence Bicknell.

Mi foje havis muŝon ;  
Tre bona kaj tre saĝa  
Ĝi estis, kvankam juna,  
Nur unutagoaĝa.

Okazis ke en akvon  
Ĝi falis, je l' flugado,  
Kaj mia ora fiŝo  
Ĝin kaptis por mangado.

Kaj tiam la naturo  
De mia fiŝ' ŝanĝiĝis ;  
La muŝon englutinte,  
Ĝi muŝofiŝo iĝis.

Post tio mia birdo,  
Belega sed mangema,  
La muŝofiŝon mangis  
Sen penso kompatema.

Kaj mia kara birdo  
Post tia buŝotuŝo,  
Ne estis simpla birdo,  
Sed birdofiŝomuŝo.

La birdofiŝomuŝo  
Flugilojn siajn batis,  
Kaj tiam mia rato  
Ĝin ekvidis, kaj malsatis.

La gusto de l' flugiloj  
Tre plaĉis al palato ;  
Kaj mia rato iĝis  
Muŝfiŝobirdorato.

Ho ve ! ekzempl' malbona !  
La kato, al orango  
Simile, tiam pensis  
Pri gusta vespermango.

La raton tuj li kaptis,  
Kaj mi, de tiu dato,  
Devigi lin eknomi  
Muŝfiŝobirdorato.

Sed baldaŭ li mortigiĝis,  
Ĉar mia hundo brava  
Ekdiris, post pripenso,  
"La kato estis prava."

Kaj tial, unu tagon,  
Li, per dentega vundo,  
Mortigi lin, kaj restis  
MUŜFIŜBIRDORATOKATOHUNDO.

## ALVOKO DE LA NATURO.

Tradukita de G. C. Law.

Estis kun bedaŭro, ke la nova vikaro, irante al la Dimanĉa kurso trans la kampoj, eltrovis en la Edeno de verdaj herbejoj kaj arboj, ondetanta rivereto kaj blua ĉielo, klaran postsignon de la Serpento. Apud la ponto, kie la rivereto fluadis kviete ĉirkaŭ la radikoj de tri salikoj, li ekvidis knabon, fiŝkaptantan. Urba knabo, laŭ sia eksteraĵo—pala vizaĝo, brilaj okuloj, kaj la nepriskribebla gajeco je la sido de sia eluzita ĉapo, kiu esprimis la Londonanon, vizitantan en Arkadio.

Ne kolere, sed per voĉo de granda doloro, la nova vikaro parolis al la kulpulo: "Ĉu vi ne konas, ke estas malbone fiŝkapti Dimanĉon posttagmeze?"

La knabo rigardis lin: "Ĉu la tempo por tagmanĝado pasis?" li demandis, kun mieno de laca surprizo.

"Certe jes," respondis la vikaro; tiu ĉi subita pruvo pri la treega priokupado de la samprofesiano frapis kordon en lia koro laŭ neatendita maniero. "Sed ĉu matenon, ĉu posttagmezon, vi konas, ke estas malbone fiŝkapti Dimanĉe."

La knabo senĝoje rigardis sian senmovan flosan—teruraĵon pentritan je strangaj ruĝaj kaj verdaj strekoj.

Io de la knaba sintenado alvokis la vikaran koron. "Neniam sukceson?" li demandis kviete.

"Ne," diris la knabo.

"Nu, aŭskultu! Vi venos nun kun mi al la lernejo, kaj vi kaj mi atencos morgaŭ nian sorton kune, se vi havos tempon."

La knabo skuis la kapon, decide.

"Ne," li diris, "mi vidis fiŝegon; mi vidis ĝin trifoje dum mi restas tie ĉi; kaj mi ne foriros ĝis kiam mi estos kaptinta ĝin. Ĝi frapis main flosan per la nazo nur por kolerigi min. Estas malbona speco da vermoj ĉirkaŭ tie ĉi; rigardu la vermon, kiun mi uzas nuntempe; kian objekton prezenti al tia fiŝo!"

"Nu," diris la vikaro, "vi devis meti ĝin pli bone sur la hokon. Rigardu, mi montros vin—almenaŭ morgaŭ—se vi volas."

Tiun ĉi momenton, aperis el la klara profundaĵo de la rivereto io, kun grandaj okuloj kaj larĝa korpo, videbla pro ĝia nigreco kaj ruĝaj naĝiloj, kiu rigardis ilin, naĝis ĉirkaŭ la flosa, kaj per skueto de vosto, malaperis en sian akvan hejmon.

"Tie ĝi estas!" diris kune la Londonano kaj la vikaro, kaj senkonscie tiu ĉi ekprenis la fiŝkaptilon.

"Ne tuŝu," diris la knabo, eksciteme, "mi kaptos ĝin!"

"Nu, serĉu vermon, belan vermon. Ĝi ne englutos vian."

Ili elserĉis la torfon, kaj la vikaro fosis per sia poŝtranĉilo kaj, eltrovinte pli bonan vermon, komencis aranĝi ĝin sur la hoko. Li okupis pli da tempo je tio ol la knabo volis; sed efektive, li havis nervan rapidecon.

"Ho, rapidu!" ekkriis la knabo kun senpacienca agonio, "la fiŝo ne atendos la tutan tagon!"

"Jen estas!" diris la alia, "mi kredas, ke li estas en kaveto inter la radikoj de tiuj ĉi arboj. Nun, mi—ne vi lasos fali kviete la fadenon en la akvon, kaj ni kuŝigos malproksime de la bordo. Kuŝigu simile al mi!"

Kaj, konformigante agadojn al vortoj, ili kuŝigis kune sur la herbo, kaj la knabo faletigis la tordantan vermon inter la radikojn.

Dek minutoj pasis. Unufoje la knabo volis eltiri la vermon por rigardi ĝin, sed la vikara mano detenis lin. Tiam, kun kvieta decidemo, la flosa faris unu rektan senŝanceliĝan salton malsupren.

"Kaptinta ĝin!" diris la knabo.

"Kaptinta ĝin!" diris la vikaro.

La bobineteto rapide turniĝis dum la fiŝego naĝis trans la rivereton.

"Ho, mi ne povas haltigi ĝin," ekkriis la knabo.

"Donu al mi la fiŝkaptilon," respondis la vikaro, "aŭ ĝi fornaĝos."

"Ne, mi volas eltiri ĝin!"

"Donu la ilon al mi, malsaĝuleto; se vi ne donos ĝin al mi, mi frapos vian kapon!"

SinJORINO BlenKinsop, revenante el la Dimanĉa kurso, kie la vikara foresto estis estinta temo de babilado, ekvidas lin kaj la knabon. Alproksimiĝante neatendite, ŝi rigardas la procedojn. Post kelkaj minutoj, la vikaro, sur la genuoj, trempinte la brakon kaj manikon senzorge en la akvon, eltiris la kaptiton teren, kaj, levigante, li vidas ŝin.

Ĉu li rugiĝis? Ĉu li ekremis? Ĉu li montris ian signon de pentro, je la malboneco de sia konduto?

Ne, kontraŭe, estis nuanco de ekscitita triumfo en lia voĉo dum li ekkriis, elmontrante la vigan fiŝon:—


"Nu, SinJORINO BlenKinsop, ĉu vi iam vidis pli grandan perkon?"

"Mi vetas mian vivon—neniam!" diris la Londonano.

ENHAVARO DE "THE ESPERANTIST." VOLUMO I. NUMEROJ 1—14.

- ANANDO. Voĉo el la Himalaja, 193.  
 ARCHIBALD, JEM ROSS. Kristnaska Pudingo, 212.  
 BAUER, ELISE. La tri amikoj; \* kaj Legendo, \* 23.  
 — Cu vi estas preta, \* 64.  
 — Mateo Falkone, \* 70.  
 — La Mistera Edziĝo, \* 148.  
 — Havro, 164.  
 BERNARD, E. Letero el Genevo, 215.  
 BICKELL, C. S. La Posteno de Robbie, \* 111.  
 BICKNELL, CLARENCE. Itala Somero, 4, 23.  
 — La lasta rozo de somero, \* 4.  
 — L'Almorvino, \* 20.  
 — Kazabianko, \* 41.  
 — Vera Rakonteto, 44.  
 — Diverslandaj Proverboj, \* 43, 64, 68.  
 — Itala Fablascienco, 68.  
 — La Nova Jaro, † 54.  
 — Militaj Rekrutoj en Italujo, 85.  
 — Itala nacia Kanto. Addio, \* 85.  
 — Progressive Limerick, 104.  
 — Reveno al la Montaro, 125.  
 — Nesentimentala Amkanto, 157.  
 — La Rozo kaj la Lekanteto, 176.  
 — La Elmigrantoj, 184.  
 — La Malgrandegulo, 205.  
 — Musfĥbirdralkathundo, 222.  
 BONO, E. PIODE. Lertaj Respondoj, \* 84, 111.  
 BOUCON, H. Fablo, \* 84.  
 BOULET, PAUL. Nokto en Kalabro, \* 143.  
 BOURLET, CARLO. Vespero, 41.  
 — Esperanto kaj Pedagogio, 115.  
 BUCHANAN, G. DOUGLAS. Atesto pri Kapableco, † 140.  
 CATT, ELIZABETH J. La Strabulino, 111.  
 ĈERVINSKI, KOLOWRAT. La plendo de la Luno, 205.  
 CLEPHAN, H. W. Kiel fondi Grupon, † 52.  
 CROOK, F. Esperantist's Hymn, 64.  
 DAVIS, REV. R. A. Unua Leciono, 151.  
 — Eterna Kalendaro, 166.  
 DESHAYS, RENE. Vintra Dolĉeco, 121.  
 DOORN, J. VAN. Esperanto en Japonujo, 134.  
 ELLKEDER, OSIP IVANOVITCH. Oje, 55.  
 ELLIS, JOHN. Esperanto por ĉiutaga vivado, † 6.  
 — La sono de Voĉo, \* 24.  
 — La deveno de Esperanto, † 76, 87.  
 ELMY, BEN. Vivo de Maristo, †, 8.  
 — Lekanteto Aŭtuna, † 22.  
 — Kantetoj Infanaĵ, \* 37.  
 ELMY, BEN. La Sfinkso, 43.  
 — La lingvo de la floroj, 79, 138.  
 — El la Rubajato, † 107.  
 — Logiko kaj Instinkto, 122.  
 — La Marsellaise, \* 145.  
 — Amikeco, 192.  
 — Nikotino, 222.  
 EUCHARIS, KASIMIR. El Marcus Aurelius, \* 131.  
 GAMBIER, M. P. (O. W.). Fabloj, \* 79.  
 — Instinkto aŭ Inteligenteco, 106, 126, 211.  
 — La Komercisto kaj la Rabistoj, 146.  
 HADFIELD, J. Amikeco. Originala Muziko, 192.  
 HAYES, C. F. Humora Flanko de Telegrafo, \* 10.  
 HENDERSON, GEORGE J. Fonto de la Lingvoj, 213.  
 HUNTER, THOMAS, M. A. Zenita Suno, 135.  
 KABE (POLUJO). La Fajfilo de Franklin, \* 44.  
 KOFMAN, A. La XIX<sup>a</sup> Jarcento, 180.  
 LAMBERT, D. A., B. A. Grafo Fathom, \* 118, 133.  
 — Okazeto Venezia, 219.  
 LAW, G. C. Peketoj de Eppie, \* 119.  
 — Irlanda Leono, \* 67.  
 — Bruselo, 165.  
 — Alvoko de la Naturo, 223.  
 LAWRENCE, E. A. Niaj Bonegaj Amikoj, 13.  
 — La Parlamentejo, 93.  
 — Majtago en Anglujo, 112.  
 LEDGER, G. Esperanto in Short-hand, 7.  
 LEGOFFRE, ERNEST. Anekdotoj, 7.  
 — Dio Savu la Reĝon, \* 8.  
 LLOYD, R. J., D. Lit., M. A. La Esperantaj Vokaloj, 167.  
 — La Sonoj Esperantaj, 182.  
 LONDON ESPERANTO CLUB. Official Reports, 168, 185, 199, 216.  
 MATHEWS, PAUL, M. A. Mordanto Mordita, 22.  
 — La Naskiĝejo, 123.  
 MATHYS, EUGENE (Filo). Patrino kaj Infano, 125.  
 MAYER, A. VON. Surprizanta, 196.  
 MEHRMANN, MAURICE. La Simio, \* 106.  
 METCALFE, EDWARD, M. A. Nokto Terura, 38.  
 — La Viro Verda, 86.  
 — La Sankta Fajro, 120.  
 — Karulineto, 157.  
 — Dormu, 205.  
 — Knabeto, 222.  
 MEYRICK, J. H. La Ĉielaj Pordoj, 80.  
 MOSCHELES, FELIX. Kion diris Max Muller, † 19.  
 MOTTEAU, A. La Ventego, \* 5, 21, 40, 56, 69, 91, 105, 124, 131.  
 — Nacia Esperanta Himno kun Muziko, 16.  
 — L'Anĝelo kaj la Infano, \* 27.  
 — Kristnaskaj Problemoj, 41.  
 — Fabloj, \* 8, 13, 27, 37, 84, 125, 150.  
 — La Spegulo, 61.  
 — Tom Bolin, \* 72.  
 — El Shakespeare, \* 83.  
 — Kion diras Birdideto? \* 176.  
 — Vekiga Himno de Infano, \* 184.  
 NANKIVELL, REV. A. H. Anakreonaĵo, 205.  
 OFFICER, WILLIAM. Bonveno, 10.  
 — Fablo, 27.  
 — Februara Promeno, 67.  
 — Karulino Mia, † 135.  
 — Antaŭen, 204.  
 OXFORD, C. Miaj Paper-Amikoj, 206.  
 RAMSAY, SIR WILLIAM. Radiumo, † 36.  
 REEVE, C. W. T. Kara Lu, \* 157.  
 RHODES, J. Giganto Malespero, \* 60.  
 ROWE, F. G. Nia Lando, kaj Muziko, 208.  
 SIMPER, ALFRED. Letero el Hindujo, 110.  
 — Bagh, la Tigro, 156.  
 — La Lupo-Knabo, 189.  
 SOUTHCOMBE, H. W. La Libertempulo, 188.  
 STEAD, W. T. Esperanto, † 1.  
 WESTCOTT, MARTYN. Strut-Makleroj, \* 162.  
 — Trezoro en la Arbaro, \* 195, 220.  
 WOODWARD, J. F. H. Fizika Kulturo, \* 179.  
 ZAMENHOF, L. L. Fonografa Parolado, 51.  
 — Pri Akademio, 58.  
 — La Deveno de Esperanto, † 76, 87.  
 SENNOMAJ. Songverigisto (8379), 44.  
 — Sciencaj Aferoj (8105), 23, 64, 83, 111.  
 — Maltaj Proverboj (8108), 84.  
 — La Periskopo (Sir T. P. L.), \* 117.  
 — Kranioj (Dro. A. M.), 203.  
 — Hindaj Proverboj (8276), 110, 213.  
 — Mia Avino (8384), 117.  
 — Kimraj Skizetoj (E. W.), 127, 142, 159, 171, 190, 207, 210.  
 — Meditadoj en Westminster Abbey\* (Rev. N. B.), 197.  
 GRAMMATICAL SYNOPSIS. 14—15.

Stat 57  
17/10/07 pu -



THE  
**ESPERANTIST.**



VOL. II.

Jan. to Dec., 1905.

Wholesale Agent:  
 14, NORFOLK ST., STRAND,  
 LONDON.

[Illegible text]

[Illegible text]







# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĜE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
MALTA.—A. Agius, Esq., 92, Strada S. Gaetano, Hamrun.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Peterburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelngatan, Stockholm.

401518

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

N.B.

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

15. [Vol. II., No. 1.]

JANUARO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later issues  
4d. each, net.

## KRISTNASKO.

Originale verkita de Clarence Bicknell.

Vilaĝ' malgranda—vintra nokto—  
Stonega grot' malhela—  
Sed tie io pli brilega  
Ol ia stel' ĉiela.

Ne reĝoj saĝaj ornamitaj  
Per multekostaj vestoj,  
Humble kurbigantaj teren  
Ĉe la manguj' de bestoj.

Kaj ne la spicoj aŭ juveloj  
Aŭ fum' de bonodoro;  
Ĉar mirindaĵo tie kuŝas  
Senpreza pli ol oro.

Riĉeco, saĝo kaj scienco,  
Malofta triopaĵo  
Mirindaj estas; sed ol ili  
Pli granda la vidaĵo!

Infan' ne longe naskiĝinta  
En la manguj' dormanta,  
Kaj apud Li patrino simpla  
La Filon rigardanta.

Jesuo Li, homara Reĝo,  
La Fil' de l' Alta Dio;  
Kaj ŝi, virino el virinoj,  
La Virgulin' Mario.

Li nun el Dia trono regas  
Eterne adorata;  
Kaj ŝi ĉielan kronon portas  
De l' tuta mond' benata.

## DEMANDO.<sup>1</sup>

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A.  
(Oxon).

Mi, starante ĉe la rando  
De la Rondo Familia,  
Min prezentas per demando  
Al gelertularo mia;  
Min prezentas per demando,  
Mi,—la iu ĉe la rando.  
Se, eminentulo mia  
Vi de mi demandas, "Kies  
La demando?" Al la via  
Peto, ĉu mi diros, "Mies" ?  
Jen, kleruloj, la demando  
De la iu ĉe la rando.  
Ho! Samideanoj miaj  
Nur per la respondo ĉies  
Per voĉdonoj vere viaj  
Faros vi la lingvon vies.  
Pensu, do, pri la demando  
De la iu ĉe la rando.

## LA LAMPIRO KAJ LA BUFO.

Tradukita de A. Motteau.

Lampiro el la herb' heletis  
Fosfore (vesper' lumigilo),  
Ĝin Bufo ekvidint' eljetis  
L' enhavon de venenpafilo  
Al la nekulp' vermo stela.  
—"Neniam," la Lampiro diris,  
"Mi malbonaĵon al vi faris;  
Min kial do vi nun mortigas?"  
Respondis Bufo la malbela:  
"Ĉu vi ne lumon diŝvastigas?"

<sup>1</sup> La Redaktoro tre ofte ricevis tiun demandon.

## MONATO POST MONATO.

La mondo nun pliaĝiĝis per unu jaro, kaj ni ĉiuj tial pliaĝiĝis. La progreso farita de Esperanto estas eĉ pli rimarkinda ol dum la jaro 1903. Al ĉiuj kunbatalantoj ni deziras sendi koregajn gratulojn pro tiu ĉi sukcesoj, kaj ni ankaŭ aldonas la plej sincerajn bondezirojn por la nova jaro. Ĝi estu ankoraŭ pli progresema! Ĝi estu eĉ pli feliĉa por la Esperantistoj!

Lastan monaton ni havis la plezuron aranĝi la Enhavnomaron de nia unua volumo, kaj la fakto memorigis al ni multajn ĉarmajn horojn kun la Esperantistoj, persone kaj letere. Precipe ni deziras sendi bondezirojn al nia sindonema verkaro. Ili fariĝu pli kaj pli internaciaj!

Kiam skeptikulo trarigardos tiun enhavnomaron, li ne plu dubos la internaciecon de la lingvo.

Dank' al la jara progresado en Anglujo, oni ne plu devas kredi, ke "Esperanto estas kuracilo por korpaj malsanoj," aŭ "nova nutraĵo por la homa korpo," sed preskaŭ ĉiuj scias ke Esperanto nutras nur la spiriton, kaj kuracas nur la malpacigojn de la homaro.

Estas mirinde ekscii kiom da anoncado estas necesa antaŭ ol la loĝantoj de eĉ unu malgranda urbo ĉiuj konatiĝu kun la temo, kaj, kompreneble, restas ankoraŭ multe, multe da farota laboro. Ni ne laciĝu, ni ne restu je niaj laŭroj, rigardante la ĝardenon, kiu enhavas tiom da semitaj semoj! Ne, ni devas ĉiam klopodadi; ni ja devas akvi la semojn per la pura akvo de internacieco, kaj ni devas zorgi ke ili ne sekigu pro manko de intereso, flego, aŭ helpo niaparte.

Profeto dirus ke tiu ĉi nova jaro devas esti tre grava por la Esperanta movado. Ĉu ni ne havos almenaŭ unu grandan Internacian Kunvenon, kiu kredeble okazos en Aŭgusto, inter niaj afeblegaj Boulogneaj amikoj? Kaj ĉu tiu ĉi senpacience atendata renkontiĝo ne honorigos je la ĉeesto de nia estimata estro, Doktoro Zamenhof mem!

Tiu ĉi sola fakto estas sufiĉe famigi la nunan jaron, sed ja estas ne bezone atendi ĝis la bela somero por trovi signojn de progreso. Malvarma vintro produktos diversajn novajn gazetojn, kiujn sendube la varmeta printempa kaj varma somera vetero florigos, ĝis ili povos posedi ian influon inter la jam multenombraj internaciaj gazetoj.

Tiu ĉi fakto, la plimultiĝo de gazetoj, estas unu kaŭzo de la nepligrandigo de THE ESPERANTIST. Niaj legantoj memoros ke ni proponis pligrandigi ĝin, se eble, dum la 1905a jaro. Ni multe timis ke, la progreso de nia afero postulus tiun ĉi

## MONTH BY MONTH.

The world is now older by a year, and we are all the wiser in consequence. The progress made by Esperanto is even more remarkable than during the year 1903. To all fellow-workers do we desire to send most hearty congratulations on this success, and we also add our most sincere good wishes for the New Year. May it be still more progressive! May it be even happier for Esperantists!

Last month we had the pleasure of arranging the index of our first volume, and the fact reminded us of many charming hours spent with Esperantists in person and by letter. Especially do we desire to send good wishes to our devoted contributors. May they become more and more international!

When a sceptic looks through this index he can no longer doubt the internationality of the language.

Thanks to the year's progress in England, one no longer need believe that "Esperanto is a cure for bodily ailments," or "a new food for the human frame," but almost all are aware that Esperanto feeds only the mind, and cures but the discords of humanity.

It is wonderful to find out how much advertising is necessary before the inhabitants of even a small town can all be made cognisant of the matter, and of course a great deal of work still remains to be done. Let us not weary; let us not rest on our laurels watching the garden which contains so many sown seeds! No, let us ever be busy; we must indeed water the seeds with the pure water of internationality, and we must take care that they be not dried up for lack of interest, care, or assistance on our part.

A prophet would say that this new year must be very important for the Esperanto movement. Shall we not have at least one great International Congress, which will probably take place in August among our kind friends in Boulogne? And will not this impatiently-awaited gathering be honoured by the presence of our esteemed chief, Dr. Zamenhof himself!

This single fact is enough to make the present year famous, but it is indeed unnecessary to wait for the lovely summer time to find signs of progress. Chill winter will bring forth divers new gazettes, which, no doubt, warm spring and hot summer will cause to flourish, till they can obtain some influence among the already numerous international journals.

This fact, the increase in the number of gazettes, is one reason for the non-enlargement of THE ESPERANTIST. Our readers may remember that we proposed to enlarge it if possible during 1905. We much feared that the progress of the cause

pligrandigon, kvankam ni trovas, ke dek ses paĝoj **estas** ja sufiĉaj por nia libertempo.

Kaj, ĉar nun ne estos necese pligrandigi gazeton, kiu ne plu estos la *sola* Brita organo, ni klopodas ĝin pligrandigi sen pligrandigo! Tiu ĉi ŝajnos sendube paradoksa al niaj legantoj; ĝi tamen **estas** la vero, ke ni trafis! Anstataŭ la klubaj sciigoj, kiuj antaŭe troviĝis nur Angle, ni intencas presigi serion da artikoloj sub le nomo *Monato post Monato*. Tiuj ĉi enhavos, en la du lingvoj, la memorindajn agojn de la antaŭa monato. Tiel alilandaj Esperantistoj—kiuj ĉiam plimultiĝas inter nia abonintaro—ne perdos tri aŭ kvar paĝojn, kaj enlandaj Esperantistoj ĝajnos pli da ekzercado pro la ŝatataj laŭvortaj tradukoj. Jen la Q.E.F. kaj la Q.E.D. de nia problemo.

Du diversaj vojoj nun malfermiĝas antaŭ ni. Ni povas komenci tiun ĉi serion per resumo de la jam farita progreso de la lasta jaro, aŭ ni povos limigi niajn rimarkojn je la lasta monato. Uzante la supredonitan titolon, la dua el tiuj ĉi du vojoj ŝajnas esti preferinda, kaj ni nun pritraktas la memorindaĵojn de la 1904a jarfino.

Estas malvarme dum la vintraj monatoj, ni do komencos nian esploron en pli varmaj landoj, kie la Esperanta Suno sin montris pli forta kaj potenca ol antaŭe. Plej malproksime, la vasta regiono de Queensland, Aŭstralio, meritas atenton nian. La Redaktoro de la plej gravaj tieaj ĵurnaloj anigis je Esperanto; ni verkis artikoleon kiu eble poste tie aperos, kaj, el diversaj partoj de la Kolonio venas la kutimajn demandojn de niaj estontaj kunbatalantoj. Nova Zelando ankaŭ estas Esperantema nuntempe, kaj la diversaj jam presitaj artikoloj alportas siajn fruktojn.

Tiel varma, kaj eĉ pli vasta, la Hindujo nun kolektas varbulojn por nia aro. S<sup>ro</sup> Adinarayana Chettiar verkis valoran artikolon sur la *Indian Review*, la plej grava el la tieaj gazetoj. Ni ankaŭ skribis respondon,—presota aŭ ne, laŭ la volo de "Lia Redaktora Moŝto."

En Centra Ameriko, la Direktoro de la Nacia Instituto de la Respubliko San Salvador varme aprobas la Esperantajn paroladojn de nia abonanto, S<sup>ro</sup> R. G. Abril. Eble, pro tiu ĉi fakto, ni scivolaj Esperantistoj baldaŭ ekkonos plu pri tiuj ĉi (de ni preskaŭ nekonataj) Respublikoj. Parolante pri tiuj ĉi, ni ja bone memoras interesan okazon. Tre fervora amiko translokigis en Venezuelon, kaj kompreneble, ni proponis ke li tie fondigu grupon. Post kelkaj semajnoj alvenis poŝtkarto, prezentanta "La Grupo Progreso." Sed bedaŭrinde estis areto da nudaj nigruloj! Sed, sen ŝerc' devas esti en Venezuelo, multaj intoligentaj

would demand this increase, although we find that sixteen pages are indeed enough for our free time.

And, as it will not now be necessary to enlarge a gazette which will no longer be the *only* British organ, we are taking pains to enlarge it without enlarging it! This may seem paradoxical to our readers; it is nevertheless true that we have succeeded. Instead of the club news, which formerly was found only in English, we intend to print a series of articles under the title of "Month by Month." These will contain, in the two languages, the memorable events of the preceding month. Thus Esperantists in other lands—who are constantly becoming more numerous among our subscribers—will not lose three or four pages, and inland Esperantists will gain more practice by means of the appreciated literal translations. Here is the Q.E.F. and the Q.E.D. of our problem.

Two different courses now open up before us. We can begin this series with a *résumé* of the accomplished progress of last year, or we can limit our remarks to the last month. Employing the title given above, the latter of these courses seems preferable, and we now treat of the memorable events of the close of 1904.

It is cold during the winter months, so we will commence our explorations in warmer lands, where the Esperantic Sun has shown itself stronger and more powerful than of old. Farthest off, the vast region of Queensland, Australia, merits our notice. The Editor of the most important journals there has become allied with Esperanto; we have written a short article, which perhaps will appear there later, and from divers parts of the Colony come the usual inquiries from our future fellow-workers. New Zealand is also Esperantically inclined at present, and the several articles already published are bringing in their fruits.

As warm, and even vaster, India now enrolls recruits for our army. Mr. Adinarayana Chettiar has written a valuable article in the *Indian Review*, the most important of local gazettes. We have also written a reply—to be printed or not, according to the will of "His Mightiness the Editor."

In Central America, the Director of the National Institute of San Salvador warmly approves of the Esperanto lectures of our subscriber, Mr. R. G. Abril. Perchance in this account we inquisitive Esperantists will soon be able to find out more about these (to us) almost unknown Republics. Speaking of these, we well remember an interesting circumstance. A very enthusiastic friend moved into Venezuela, and, of course, we proposed that he should found a group there. A few weeks later came a postcard representing "The Group Progress," but, unfortunately, it was a cluster of naked niggers! But, joking aside, there must be

homoj, kiuj konsentos Esperantistigi. Interesaj artikoloj antaŭ ne longe venis el Virginia kaj Erie en la Unuigataj Ŝtatoj.

Pli proksime je ni, en progresama Maltujo, supersignitaj literoj malhelpas la fondigon de la atendata *Malta Gazeto*, sed espereble, la solvo de la problemo apudestas, kaj ni baldaŭ povos doni al ĝi bonvenon.

El Alĝerujo, la ĉiam energia Kapitano Capé sendas interesajn sciigojn, kaj, inter alioj, deziras ricevi la nomojn de tiuj, kiuj povos partopreni je Esperantista Karavano ĉe Pasko, 1905. Oni ankaŭ organizas ekspozicion. Ĉu helpontoj bonvolos skribi al la Prezidanto, 17, Boulevard Gambetta, Algiers?

En Anglujo, kuraĝiga sciigo venas el Folkestone. La Komerca Ĉambro tre interesiĝis pro parolado farata de S<sup>ro</sup> Geddes, la bonekonata Sekretario de la Dovera Grupo. Sendube la fondo de Folkestone Societo baldaŭ sekvos, kaj ni tiam povos aĉeti rond-vojaĝan bileton por viziti la "Kvin Havenojn Esperantistajn," Dover, Folkestone, Boulogne, Calais, kaj Ostend! Jen libertempa ekskurso por la maramantoj! Pripensu je tio!

Hastings nun posedas Grupon, kies prezidanto estas D<sup>ro</sup> Martyn Westcott. Tiu ĉi fervora kunlaboranto ofte verkas artikolojn pro kaj por Esperanto. Li diras al ni ke dum restado en Parizo li vizitis Notre Dame, kaj tie ĝoje ekvidis la verdajn steletojn ĉe la butontruoj de du Hispanaj vojaĝantoj. Ne estas necese diri, ke la kontenteco estis reciproka, kaj la proverbo ke "du plezurigas, tri ĝenas," ne tie trovis pruvon.

Ĉe la Club Café ni de la Londona Klubo havis la plezuron aŭskulti serion de artikoloj pri la Germana literaturo, kiun afable elparolis nia vizitanto S<sup>ro</sup> Jürgensen. Tiam, kiel ĉiam, Esperanto ne bezonis tradukiston!

Sed eble la plej bona pruvo de progreso estas la fakto ke la Esperanta Biblioteko ankoraŭ pli grandigis. La *Ventego*, de Shakespeare (Arta Eldono, 3 fr.), nun estas preta. Alia bonepresita verko sur bona papero, kiu donos al ĉiuj grandan plezuron kaj instruon, venas el Belgujo: *Paĝoj el la Flandra Literaturo*, tradukitaj de D<sup>ro</sup> Seynaeve kaj D<sup>ro</sup> van Melckebeke (134 pp., 1s. 6d.).

La Fermo Hachette ankaŭ eldonigis *Kondukanto de la Interparolado kaj Korespondado*, de A. Grabowski (180 pp., 2s.); utila internacia volumo.

Multaj Korespondantoj mendis kovrilon por la unua volumo. Ni bedaŭras, ke ni ne eldonos specialan kovrilon, ĉar la plejmulto el niaj legantoj havas, ni esperas, sian specialajn ŝatojn, kaj preferos elekti sian propran bindaĵon.

LA REDAKTORO.

many intelligent folk in Venezuela who are willing to become Esperantists. Interesting articles have lately come from Virginia and Erie, in the United States.

Nearer to us, in progressive Malta, accented letters hinder the foundation of the awaited *Maltese Gazette*, but it is to be hoped that the solution of the difficulty is at hand, and that we shall soon be able to give it a welcome.

From Algeria, the ever-busy Captain Capé sends interesting news, and, among other things, wishes to receive the names of those able to take part in an Esperanto Caravan at Easter, 1905. An exhibition is also being organised. Will helpers kindly write to the President, 17, Boulevard Gambetta, Algiers?

In England, encouraging news comes from Folkestone. The Chamber of Commerce was much interested at a lecture given by Mr. Geddes, the well-known secretary of the Dover Group. Doubtless the foundation of a Folkestone Society will soon follow, and we shall then be able to invest in circular tickets to visit the "Five Esperanto Havens," Dover, Folkestone, Boulogne, Calais, and Ostend. There is a holiday trip for lovers of the sea! Just think of it!

Hastings now possesses a group, whose president is Dr. Martyn Westcott. This devoted collaborator has often written pro-Esperanto articles. He tells us that during a stay in Paris he visited *Notre Dame*, and there saw with pleasure the green stars worn in the buttonholes of two Spaniards. It is needless to say that the pleasure was mutual, and the proverb, "Two's company, three's none," did not here find confirmation.

At the Club Café we of the London Club had the pleasure of listening to a series of articles on German literature, kindly delivered by our visitor, Mr. Jürgensen. Then, as always, Esperanto needed no interpreter!

But possibly the best proof of our progress is the fact that the Esperanto Library has further increased. Shakespeare's "Tempest" (Art Edition, 2s. 6d.) is now ready. Another well-printed book, on nice paper, which will give all much pleasure and instruction, comes from Belgium: *Pages from Flemish Literature*, translated by Drs. Seynaeve and van Melckebeke (134 pp., 1s. 6d.).

Messrs. Hachette have also published *Conversation and Correspondence Guide*, by A. Grabowski (180 pp., 2s.); a useful international volume.

Many Correspondents have applied for a cover for Vol. I. We regret that we are not publishing any special cover, as the majority of our readers have, we hope, their special fancies, and will prefer to choose their own binding.

[LITERAL TRANSLATION].

## LA MALJUNA SONORIGISTO.

Rakonto de V. Korolenko. Tradukita de Alfonso Wachter (Riga).

La vilaĝeto kviete dormetas. La nebulaj konturoj de la malriĉaj dometoj nur malklare disegniĝas. Ie lumo lumetas, nur malofte pordego kraketas aŭ gardahundo ekbojas: iafoje el la malhela maso de la bruetanta arbaro la formoj de pielirantoj aŭ de solaj rajdantoj movas; aŭ la radoj de veturilo grincas. Tiuj estas la loĝantoj de la unuopaj vilaĝetoj, kiuj kunvenas en sian preĝejon festi la printempan feston.

La preĝejo staras sur monteto, en la mezo de la vilaĝeto. La fenestroj radias je lumo. La malnova, alta, malluma sonorilejo alte superstaras en la malhele blua ĉielo.

La ŝtupoj de la ŝtuparo krakas; la maljuna sonorigisto Miĥeiĉo supreniras la turon, kaj baldaŭ lia malgranda lanterno perdiĝas en la spaco, kiel en la aero libere flugpendanta stelo. La supreniro de la ŝtuparo kaŭzas penadon al la maljunulo. La piedoj ne volas obei plu, kaj la okuloj vidas nur malbone. Jam estas tempo iri je ripozo, sed Dio ankoraŭ ĉiam ne sendas la morton. Li enterigis la filojn, la nepojn, li sekvis la maljunulojn kaj la junulojn al la tombo kaj li vivas ankoraŭ! Estas malfacile.

Ofte li jam festis la printempan feston; ofte, li ne scias kiel ofte, li atendis la festan horon tie ĉi en la sonorilejo.

La maljunulo paŝas la galerion de la preĝeja turo kaj li apogiĝas je la balustrado. Sube, ĉirkaŭ la preĝejo, etendiĝas la tomboj de la vilaĝa tombejo; la malnovaj krucoj troviĝas tie, kvazaŭ defendantaj brakoj super la mortintoj. Tie ĉi kaj tie betulo kreskas, kies foliaro ankoraŭ ne burĝonas. De tie la bona spicaodoro de junaj burĝonoj kaj la malĝoja trankvileco de eterna dormo atingas al Miĥeiĉo.

Kio estos kun li post unu jaro? Ĉu li denove staros tie supre sub la metala sonorilo veki per laŭta sono la dormetantan nokton? Aŭ ĉu li kuŝos tie sube, en la malluma angulo de la tombejo? Dio scias! Li estas preta, sed tiun ĉi fojon Dio lasis lin festi la feston. "Al la Sinjoro estu danko!" la maljunaj lipoj murmuretis la kutiman formulon, kaj Miĥeiĉo suprenrigardis en la stelplenan altaĵon, en la ĉielon, kie radiis milionoj da lumoj.

"Miĥeiĉo, Miĥeiĉo!" eksonas de sube, tiel same, maljuna tremanta voĉo. La maljuna diakono rigardas supren je la turo kaj tenas la manon antaŭ la palpebrumantaj larmantaj okuloj, sed li malgraŭe ne vidas Miĥeiĉon. "Kion vi volas?

Tie ĉi mi estas," la sonorigisto respondas, kaj, kurbigante el la turo: "Ĉu vi ne vidas min?"

"Ne, ĉu ne estas jam tempo? Kion vi pensas?"

Ambaŭ ili regardis la stelojn. Mil lumoj de Dio lumetas super ili en la alteco. La flamanta "veturilo" staras jam tre alte. Miĥeiĉo meditas. "Ankoraŭ ne, estas ankoraŭ tro frue. Mi scias la tempon!"

Li scias; li bezonas nenian horloĝon. La tero, kaj la ĉielo, kaj la blanka nubeto kiu mallaŭte naĝas en la etero, kaj la malluma arbaro, kiu tre mistere paroletas, kaj la murmureto, ĉiuj estas konataj, ĉiuj estas parencaj al li. Ne vane li vivis tie ĉi sian tutan vivon.

La malproksima estinteco viviĝas antaŭ li. Li memoras kiel li foje supreniris ĉi tiun sonorilejon. Ho Dio! Kiel longe de tiu tempo. Kaj do mallongatempo! Li vidas sin kiam blonde bukla knabo; la okuloj brilis, la vento—ne tiu kiu turnigadas la polvon sur la stratoj, sed aparta vento, kiu per liaj senbrujaj flugiloj blovas sur tero—ludis en liaj bukloj. Sube, tute malproksime malmulte da malgrandaj homoj iris, la dometoj de la vilaĝo staris, kaj la arbaro etendiĝis, kaj nur la maldensejo sur kiu la vilaĝo staris ŝajnis grandega, preskaŭ senlima. "Kaj tie ĝi ja estas, en ĝia tuta grandeco!" ridetas la maljunulo, kaj li malsupren rigardas je la malgranda maldensejo.

Tia estas ankoraŭ la vivo! En la juneco ni vidas nek finon, nek limon. Kaj tiam ĝi kuŝas tie, kiel sur la supraĵo de la mano, de la komenco ĝis la fino, tie en la angulo de la tombejo! Estas tempo por ripozi! Ja estas tempo! Miĥeiĉo ankoraŭ unufoje rigardas je la steloj, levigas, surmetas la ĉapelon kaj kolektas la ŝnurojn de la sonoriloj.

Post minuto, la nokta aero ektemas pro laŭta sono, dua, tria, kvara sekvas unu la alian, kaj en la varmetan nokton elsonas potencaj, lonĝetirataj, kantantaj, kaj sonorantaj tonoj.

Ili silentas. En la preĝejo komencas la Diservo. En la pli fruaj jaroj Miĥeiĉo estis ĉiam malsuprenirinta, kaj estis starinta ĉe la pordo por preĝi kaj aŭskulti la kanton. Sed nun li restas en sia alteco, li do estas tiel laca hodiaŭ. Li sidiĝas sur la benko, aŭskultas la mutiĝantan sonoradon de la svinganta metalo, kaj meditas. Pri kio? Eĉ li povis doni nenian respondon je tiu ĉi demando. La turo estas nur nesufiĉe lumigata per la malgranda lanterno,

la sonoriloj mem estas perditaj en mallumo; de malsupre el la preĝejo kelkfoje eksonas mallaita kanto, kaj nokta vento movas la ŝnurojn kiuj estas alligitaj al la feraj koroj de la sonoriloj.

La maljunulo lasas profunde malleviĝi la kapon, en kiun venas neklaraj pensoj.

"Ili kantas la himnon," li pensas, kaj vidas sin en la preĝejo. Infanokuloj malsuprene rigardas de la horejo. La maljuna pastro, la mortinta Patro Naŭmo, preĝas je tremanta voĉo la finan preĝon. Cent kapoj de vilaĝanoj subfleksigas kiel maturaj spikoj je la vento, kaj denove starigas. Ili faras la signon de la kruco. Estas nur konataj vizaĝoj. Tie la severa vizaĝo de la patro, tie la pli maljuna frato kiu profunde ekĝemas. Tie li mem, florante en sano kaj forto, plena de nekonata espero kaj feliĉeco, de la ĝojoj de la vivo!

Kie estas la feliĉeco? Malsuferebla laboro, turmento, zorgo! Kie estas la feliĉeco? La malfacila sorto fosas faltojn sur la juna frunto; fleksigas la fortan dorson; instruas ekĝemi kiel la pli maljuna frato!

Sed tie, maldekstre, inter la vilaĝaninoj, kun humile subfleksita kapo, staras lia "knabino." Ŝi estis bona odzino, ŝi ripozu en paco! Kaj multajn suferojn ŝi suferis, la amatino!

Mizero, kaj laboro, kaj sufero detruas la plej belan virinon; la brilo de la okuloj estingigas, kaj esprimo de ĉiama timo antaŭ la neatenditaj batoj de la sorto anstataŭas la ĉarmegan belecon de juneco! Jes, kie estas ilia feliĉeco?

Unu el la filoj estis restinta al ili, ilia espero, ilia ĝojo, sed ankaŭ ĉi tiun la maljusteco de la homoj detruis.

Jes, tie li sidas, la riĉa pekulo, kaj subfleksas sin ĝis la tero, kaj opiniis ke per tio li povos delavi la larmojn de la orfoj; humilege li falas sur genuojn, kaj batas la frunton kontraŭ la tero.

Sed Miheico furiozas, kaj la malhelaj vizaĝoj de la sanktuloj sur la muroj serioze rigardas super la homa sufero kaj la homa maljusteco.

Ĉio tio estis pasinta, ĉio tio kuŝas malproksime je li. Nun la mondo konsistas por li el ĉi tiu malvasta turo, kie la vento en la mallumeco kriegas kaj ekmovas la sonorilajn ŝnurojn.

"Dio juĝos vin," la maljunulo murmuris, kaj larmoj fluadas sur liaj maljunaj vangoj.

"Miheico, he Miheico! Kio estas? Ĉu vi ekdormis?" eksonas de sube. "Kion!" vokas la maljunulo, kaj li rapide saltas sur la piedojn. "Dio, mi do ne estas ekdorminta! Estas la unua fojo! Kaj, je rapida lerta mano, li kolektas la ŝnurojn. Sube, preskaŭ kiel formikoj, moviĝas la amaso de la vilaĝanoj, la orbrilantaj standardoj de la preĝejo flugetas en la aero. Estas la ĉirkaŭiro. La procesio ĉirkaŭ la preĝejo estas finita, kaj

Miheico aŭdas la ĝoja voko "Kristo estas reviviginta."

Kaj tiu ĉi voko pelas ondegon for de la maljuna koro de Miheico. Ŝajnas al li ke la vakskandeloj pli hele ekbrilas, ke la amaso pli dense ondetadas, kaj la standardoj pli gaje flugetas.

Antaŭe neniam la maljuna Miheico tiel sonoris. Ŝajnas, ke la plenega maljuna koro vivigas la senvivan metalon, kaj la tonoj ĝojegas kaj kantas, ridas kaj ploras, kaj ĉiam pli alte ĝis fine ili atingas la steloplanan ĉielon. Kaj la steloj brilas kaj brilegas ĉiam pli hele, kaj la sonoriloj tremas kaj supreniras, kaj denove falas, kresante, sur la tero.

La granda baso sonegas, kaj vokas per potenca forta voĉo, pro kio ektemas ĉielo kaj tero: "Kristo estas reviviginta!"

Kaj du tenoroj, tremantaj pro egalaj batoj de la feraj koroj de la sonoriloj, unuvoĉe kaj belsono kantas: "Kristo estas reviviginta!"

Kajdu tute malgrandaj sopranoj, kvazaŭ timeme, miksiĝas inter la grandaj, kaj ĝoje kaj kiel malgrandaj infanoj, rapide kantas: "Kristo estas reviviginta!"

Kaj ŝajnas, ke la malnova sonorilejo tremas kaj ŝanceliĝas, kaj ke la vento, kiu ventumas la vizaĝon de la sonorigisto, etendas siajn larĝajn flugilojn kaj kunkantas: "Kristo estas reviviginta!"

Kaj la maljuna koro forgesas la vivon, kun ĝiaj zorgoj, kaj ĝia mizero. Li forgesas ke sia vivo estis forfluinta nur en ĉi tiu malvasta kaj malhela turo, ke li restas sola en la mondo, kiel maljuna arbo, kiun la fulmo frakasis. Li aŭskultas la tonojn, tiujn ĉi kantantajn kaj ĝemantajn sonorilojn, kiuj ŝvingas al la fera ĉielo, kaj denove malsupreniras sur la malriĉa tero, kaj ŝajnas al li, ke li estas denove ĉirkaŭata de siaj filoj kaj nepoj, kaj ke iliaj ĝojaj voĉoj unuiĝas al la horo kaj kantas al li pri feliĉeco, pri ĝojo kiujn li ja ne konis en vivo.

La maljuna sonorigisto tiris la ŝnurojn; grandaj larmoj fluis sur liaj vangoj, kaj lia koro frapis pli forte, pro la iluzia feliĉeco.

Sube, la vilaĝanoj aŭskultis kaj interparolis. Neniam la maljuna Miheico tiel mirinde sonigadis!

Subite la granda sonorilo tremis falstone, kaj mutiĝis.

La voĉoj mutiĝis, kvazaŭ oni volis aŭskulti la malĝojan etenditan tonon, kiu tremis, kaj ploris, kaj ĝemis kaj, iom post iom, sin perdis en la aero.

La maljunulo refalis senforte sur la benkon, kaj du lastaj larmoj fluis malrapide sur liaj palegaj vangoj.

Anstataŭ lin, vi tie sube! La maljuna sonorigisto elsonoris!

## ŜAFTONDADO EN AUSTRALIO.

Originale verkita de J. Booth, M.C.E.

Eble la plej karakteriza afero kiun oni povas vidi en tiu ĉi lando estas unu el niaj grandaj ŝaftondejoj dum plena irado.

La konstruaĵo uzata por tiu afero nesimilas kian ajn, ĝia vidigo estas ofte pentrinda, ofte mala. La aktiveco de la afero dum tond-tempo estas miriga; dum neuzatempo, miro estas ke la loko aperas tiel lasata kaj senbrua, kiel dezerto.

La konstruaĵo, kiun ni nomas "Woolshed" (elp. ŭilŝed), estas konstruata el ligno, per grandaj pezegaj stangejoj kaj traboj, trunkoj de arboj faligitaj en najbaroj arbaroj, apenaŭ pli ol deŝeligitaj, aŭ malebene segitaj kaj hakitaj. Ĝi estas tegmentata per ŝelo, aŭ, pli malantikve, per zinkita fero, murata per lignaĵoj, kaj interne dividata je multaj ŝafkortoĵoj kaj vojetoj. Ĝi havas neniajn fenestrojn sed nur truojn, kovratajn, se bezone, per lignaj kovriloj.

Internaj dividaĵoj de la "ŝed" estas farataj per lignobariloj por konstrui ejojn en kiuj staras la ŝafoj.

Ce unu fino de la "ŝed" estas la granda ŝafenirejo, ĉe la alia, la pordego tra kiu la ŝakegoj de lano estas portataj al vagonoj. Inter la ŝafoj kaj tiu pordego staras la tablo aŭ benko sur kiu oni ekzamenas la ŝaflanojn; kaj ankaŭ la lanpremegilo. Apud tiu ĉi sin trovas ujoj por inko, numeriloj, brosoj, kudriloj kaj ŝnuretoj, k.t.p. La oficejeto de "ŝed-estro" kutime lokigas en proksima angulo. La "ŝed" eble ne estas afero tre beleta, sed tamen oni devis ĝin sperte desegni ĉiudetale, tial ke ne estu ia temperdo nek difekteco al ŝafoj aŭ lano, nek malhelpo al tondistoj.

Nu vidu kampon, tiel grandan kaj larĝan ke oni ne povas vidi limojn ie, jen arbata per Eŭkaliptoj, altaj aŭ malaltaj laŭ iliaj specoj sed ĉiam verdaj, jen tute nearbata nature aŭ nearbigata homlabore, aŭ aukoraŭ, kaj plej ofte, nek nearbata, nek verdigata per arboj; sed plena je arboj, mortigitaj per ŝeltranĉado ringe (tie ĉi nomata "ringado," Angle, *ringing*).

Tiu ĉi ringado, mi devas klarigi, estas la tranĉo tute ĉirkaŭ arbo, tute tra la ŝelo, intence ĝin mortigi por plibonigi la kreskadon de la ĉirkaŭa herbaro, sen la laborego postulata por arbon elfosi.

Blankaj, nudaj, malbelaj, staras tiuj mortaĵoj, aŭ en sunbrilego, aŭ en malvarma blua lunlumo; sed iel tamen rigardindaj kaj majestaj, ĉar ili estas tiel multaj, tiel grandaj, tiel similaj.

Ce tia loko sin trovas nia konstruaĵo, eblege apud rivereto, eble apud fosita akvotruo, ĉar riveroj estas malmultaj tie ĉi. Ĉirkaŭe staras dometoj por tondistoj kaj laboristaj. Krom tiuj, kaj kelkaj lignaj bariloj, nenio estas videbla pli proksime ol eble kelkaj mejloj.

Neuzatempo, ĉio estas sufiĉe malaktiva, sed tiam kiam la tempo alvenas kiam la tondegado komencas, kia ŝanĝo! Tiam la tuta loko ekviviĝas, dometoj estas enlogigitaj, eĉ troplenigataj, viroj kaj knaboj kuradas tien ĉi kaj tien, kaj anstataŭ ol la antaŭa senbruego, oni atidas bruegadojn, ekkriojn, babilaĵojn ĉiaspecajn, kaj, pli laŭte ol ĉio, blekon blekegon, blekadon de ŝafoj kaj iliaj idoj!

Tiu ĉi estas la okupega tempo el jaro por la ŝafposedantoj. Dum tiuj ĉi tri aŭ kvar semajnoj ili kolektas sian ĉiujaran lanrikolton; ĉiuj iliaj ŝafoj kiuj dum la jaro paŝtis sur vastaj kampoj nun estas tie ĉi amasigataj. Tien ĉi venas tondistoj de la tuta ĉirkaŭaĵo, kaj la lokaj laboristaj, tiom kiom oni povas forsendi de ilia kutima laboro, kaj multe da aliaj laboruloj kiuj serĉas laboron; ĉiuj kunrenkontiĝas por kune labori ĉe tiu ĉi afero, dum ia mallonga tempo kaj tiam poste disiri ree laŭ siaj diversavojoj.

Kiel la laboro estas farata? Kion tiu amaso faras?

Jen nu la afero komencas. Matenfrue (aŭ ofte vespere de la antaŭa tago) tiom da ŝafoj, kiom povas enhavi la plej granda ŝafkorto de la *ŝed'o*, estas kurigataj en ĝin, tiam poste, kiam ĉio estas preta, oni plenigas el tiu ĉi ŝafkorto la pli malgrandajn dividaĵojn, kiuj ĉeestas laŭlonge ambaŭflankoj de la konstruaĵo. Brua laboro ĝi estas; tia vokego, tia puŝado, tia blekado, tia piedgratado, kiu daŭras ĝis la lasta ŝafo tondiĝis. La laboristoj plenumas tiun ĉi laboron kaj ili ankaŭ faras ĉiun ordinaran nespartan laboron, da kiu estas nature multo.

Inter tiuj ĉi kontraŭ dividaĵoj, kaj la flankaj muroj staras la tondistoj. Horo batas. Ŝedestro elvokas "tempo!" Ĉiu tondisto ekprenas unu el siaj ŝafoj, trenas aŭ portas ĝin en larĝejon, rapide ĝin renversas, tenas ĝin inter siaj kruroj; kaj post malmulte da minutoj, ĝia blanka lanaro kuŝas amasata sur la planko. Tuj la nuda maldika bruteto estas forpelata tra malgranda truo en malgrandan eksterkorteton, kie oni kalkulos la nombron pro kiu ĉiu tondegisto estas pagota. En tiu ĉi korteto ankaŭ oni gudropresas la ŝafojn kaj presas per varmega feraĵo la ŝafidojn kiuj unufoje venas al tondegado. Ofte oni tranĉas la haŭton de ŝafo dum ĝia tondegado, sed tuj knabo alkuras al ĝi kun gudro-bastono, tiun surmeti kiel kuracebo sur vundoj. Tiuj ĉi knaboj ankaŭ tuje levas la lanon kaj nudpiede kuras por ĝin alporti al tiu, kiu dividas ĉiujn lanarojn laŭ specoj kaj eco, metante ĉian econ en ĝian propran ejon. Tio farita, la premistoj komencas sian laboron je la lano. Ili prenas, eble, cent, aŭ ĉirkaŭ tiom da lanaroj kaj enmetas ilin en grandan kvadratan sakegon, tenatan en kaj per duobla ligna skatolego. En ĝin

kaj en ĝi ili premas lanon per peza maŝino, de kiu la skatolo estas parto. Tiu ĉi maŝino estas farita el ligno kaj fero, havanta grandan radon kaj ŝraŭbon. Kiam sakego estas plena de multepremata laŭo, la premilo estas forlevata, la flanksuproj enfaldataj

kaj kudrataj, kaj la sakego, nompresa kaj numerata, estas ruligata apud la pordego. Ĝi restas tie ĝis oni metas ĝin sur lano-vagono por forpreni al plej proksima stacidomo aŭ urbo por vendi; aŭ eble oni ĝin sendas rekte al ŝipoj por vendi en aliaj landoj.

## HINDUSTANI KOMPARATA KUN ESPERANTO.

Originale verkita de Lt.-Col. H. K. Gordon.

La lingvo nomita "Hindustani," ankaŭ la "Lŭshkŭr" (ŭ kiel *u* en la Angla vorto "*but*"), aŭ la "Soldatlingvo" de la Hindujo, havas similecon tute konvinkan al Esperanto.

Hindujo, kun siaj 300 milionaj da anoj, enhavas proksimume 185 apartajn kaj malsamajn dialektojn aŭ lingvojn, kaj ĉirkaŭ 30 diversajn religiojn, la ĉefaj el kiuj estas la Hindu, kiu provizas 70% de la popolo; Muhumedan (aŭ Musulmani), 21%; Budhista, 3%, lasante 6% por ĉiuj aliaj.

En la fruaj jaroj de la Angla agado en Hindujo militoj intergentaj aŭ interreligiaj estis senĉesaj, kaj la Musulmanoj batalis la Hinduojn, kaj *vice versa*, de la Nordo ĝis la Sudo, kaj de la Oriento ĝis la Okcidento de la vasta Peninsulego; tiel dum la pasado de jaroj helplingvo intertriba evoluis.

Hindustani estas fondita grandmezure laŭ la Persa lingvo, la Kortagalingvo de la Orientanoj; tamen, en diversaj distriktoj ĝi aliformiĝis per lokaj karakteroj.

Sekve, la Alilandano alvenante Hinduojn unue lernas Hindustani, kiu al li havigos lingva-pasporton tra tuta la grandega regno; kaj se li lokiĝus en speciala loko, li lernos ankaŭ, se necese, la lokolingvon.

Kiel Esperanto, Hindustani estas kompare tre facila lingvo ekkompreni, precipe por la instruituloj, kiu certe havas ian konon de la Persa lingvo.

Oni ne povas diri, ke la ekzistado de Kampolingvo, aŭ universala helplingvo tre difinite emis produkti pacon; ĝi neniel sin intermetis je la patruja amo aŭ je religia diverseco, sed, kiel Esperanto, sendube ĝi permesas ke unu nacio pli bone koinatigu kun alia, kaj tiamaniere ĝi havas pacon influon.

Tamen Hindustani ne estas ĝis nun flatita, ricevinte la nomon: "*Nia kara lingvo!*"

Por ĝenerala interŝanĝo de sciencaj kaj komercaj aferoj Esperanto havas klaran valoron, kaj ŝajnas certe ke laŭ tiu ĉi direkto ĝi havas grandan estontecon antaŭ si.

Ekzemple, ni prenu Germanan kritikan verkon pri, eble Biologio aŭ Hemio; se eldonita kaj presita nur Germane, ĝi ne povos havi la divastigatan legantaron kiun eble ĝia graveco meritas. Sed se eldonita en Esperanto, la tuta civilizita mondo estus gajnanto.

The language called Hindustani, also the "Lŭshkŭr" (ŭ as *u* in the English word "*but*"), or "Camp" language of India, has a convincing analogy with Esperanto.

India, with its 300 millions of inhabitants, contains roughly 185 separate and distinct dialects or languages, with about 30 different religions, of which the chief are Hindu, furnishing 70% of the population; Muhumedan (or Musŭlmani), 21%; Buddhist, 3%, leaving 6% for all others.

In the early years of English enterprise in India intertribal and inter-religious wars were unceasing, and Musŭlmanis fought the Hindus, and *vice versa*, from North to South, and from East to West of the great Peninsula; thus in the course of years an international tongue was evolved as an intertribal language.

Hindustani is based on Persian, the Court language of the East, in different districts affected by local lingual characteristics.

As a result, the foreigner landing in India first learns Hindustani, which will furnish him with a lingual passport throughout the great country; and if he settles down in a particular part, he will also learn, if he feels inclined, the language of the district.

Like Esperanto, Hindustani is a comparatively easy language to pick up, especially by the well-educated, who are certain to have some knowledge of Persian.

The existence of a "Camp" language, or universal auxiliary tongue, cannot be said to have made very definitely for peace; it did not interfere with patriotism or "caste," but, like Esperanto, no doubt permits of one nation having a better knowledge of another, and so has a peaceful tendency.

Hindustani, however, has not so far been flattered by receiving the name of *our dear language!*

For interchange of scientific and commercial affairs generally Esperanto has a distinct value, and it seems certain that in this direction it has a great future before it.

For example, let us take a German critical work on, say, Biology or Chemistry; if printed and published only in German, it cannot have the extended body of readers to which its importance probably entitles it. But if published in Esperanto, the whole civilised world would be the gainer.



## LA OLIVOJ.

Proverbo de Lope de Rueda.

Esperantigita de A. MOTTEAU.

[LOPE DE RUEDA (1500—1565) naskiĝis en Sevilo kaj mortis en Kordovo].

## PERSONOJ.

TORUVIO, maljuna vilaĝano.  
MENCIGUELA, ilia filino.AGUEDA DE TOREGNANO, lia edzino.  
ALOJO, najbaro.*La sceno en vilaĝa strato.*

TORUVIO.—Kompata Dio, kia vetero! Neniama fulmotondro min persekutis de la monta supro al la malsupro. Mi ekpensis ke la ĉielo ĵus elfluadis, kaj ke la nuboj alrulis ĝis la tero. Almenaŭ se mia noktomanĝo estus preta . . . sed la sinjorino edzino mia eble eĉ neniam zorgis pri tio. . . . Rabiego ŝin sufoku! Ho, he! Menciguela, mia filino! (*Li frapas la pordon*). Prave! ĉiu dormas en la vilaĝo. Agueda de Toregnano! ho, he! ĉu vi min aŭdas? (*Li ree frapas*).

Venas MENCIGUELA.—Ho! patro mia, ĉu vi volas disrompi la pordon?

TORUVIO.—Bonege! vidu ŝian langon, nun! vidu ŝian bekegon! Nu, ĉu vi povus diri al mi kie estas via patrino, fraŭlino?

MENCIGUELA.—Ŝi estas ĉe la najbarino por helpi ŝin sekigi silkfadenarojn.

TORUVIO.—Peston al silkfadenaroj, al ŝi, kaj ankaŭ al vi mem. Iru tuj kaj alvoku ŝin!

AGUEDA (*alvenante*).—Nu, nu! sinjoro fanfarono! vi vidus ke, ĉar li alportas malpezan ŝarĝon da hejtligno, ne estos eble konsentigi kun li!

TORUVIO.—Kion? Malpezan ŝarĝon da ligno vi nomas ĝin, sinjorino! Mi per la ĉielo ĵuras ke mi apenaŭ povis ĝin surmeti al miaj ŝultroj, kvankam via baptifilo helpis min.

AGUEDA.—Estu do; ni nun estos riĉe provizitaj! Sed en kia stato vi staras, edzo mia! Kian figuron vi prezentas!

TORUVIO.—Mi estas trempita kiel vera supo! Rapidu, edzino, mi petas, donu al mi ion por manĝi.

AGUEDA.—He, per la diablo, kion mi povos doni al vi? Mi nenion havas.

MENCIGUELA.—Ve! patro mia, kiel malsekigita estas tiu ĉi ligno!

TORUVIO.—Jes, verege; sed sendube tio ne malebligos vian patrinojn diri, ke kompreneble roso estas la kaŭzo.

AGUEDA.—Kuru, filino, ekpreparu duon da ovojn por la noktomanĝo de via patro; poste vi pretigos lian liton.—Edzo, mi vetus, ke vi neniam jam

ekpensis labori pri tiu plantaĵo de olivujoj, kiun mi tiel rekomendis!

TORUVIO.—Kial do mi revenus hejmen tiel malfrue, se ne ĉar mi ĵus faris tion, kion vi al mi diris?

AGUEDA.—Prave do! kaj kie vi plantis?

TORUVIO.—Tie, apud la figarbo, kie mi iam kisis vin: ĉu vi memoras tion?

MENCIGUELA.—Patro, kiam ajn vi volos noktomanĝi, ĉio estas preta.

AGUEDA.—Vi ne scias tion, kion mi ĵus pensis, edzo mia? Tiu replantaĵo, kiun vi teren enmetis hodiaŭ, post ses aŭ sep jaroj, produktos kvar aŭ kvin centfuntojn da olivoj, kaj, aldonante branĉeton tie ĉi, branĉeton tie, post dudek kvin aŭ tridek jaroj, vi havos sufiĉegan fruktodonan olivarbejon.

TORUVIO.—Neniu povus esti pli prava ol vi, edzino; tio nepre plenumos mirindaĵon.

AGUEDA.—Edzo mia, mi ĵus ankaŭ pensis—Ĉu vi scias kion?—Ne?—Nu, aŭskultu bone. Mi mem faros la olivkolektadon, vi transportigos ilin sur via azeneto, kaj Menciguela vendos ilin en la vendejo. Sed, filino, memoru tion, kion mi nun diras al vi: vi devos postuli por ĉiu buŝelo almenaŭ po du *Kastiliaj realoj*.

TORUVIO.—Po du Kastiliaj realoj! Ho! certe vi ŝercetas; ne estus konscienco. Sufiĉe estos vendi ĉiun buŝelon po dekkvar aŭ eble dekkvin denaroj.

AGUEDA.—Silentu, mi petas! Estas plantaĵo de la plej bona speco, Kordova plantaĵo!

TORUVIO.—Nu! Eĉ se ĝi estus Kordova speco, la prezo, kiun mi ĵus nomis, estos sufiĉa.

AGUEDA.—Silentu, mi repetas! Ne min surdigu per via sensencaĵo. Nu do, filino, vi ĵus aŭdis min; po du Kastiliaj realoj; ne malpialta prezo!

TORUVIO.—Ankoraŭ? Venu tie ĉi, filineto. Kioman prezon vi postulos por la olivoj?

MENCIGUELA.—Tioman prezon kiun vi volos, patro mia.

TORUVIO.—Dekkvar aŭ dekkvin denarojn?

MENCIGUELA.—Jes, mia patro.  
 AGUEDA.—Kion? “Jes, mia patro.” Venu, tie ĉi, filineto. Kion vi demandas por la olivoj?  
 MENCIGUELA.—Tion, kion vi volos, patrino.  
 AGUEDA.—Du Kastiliajn realojn?  
 TORUVIO (*kolere*).—Kompaton! Du realojn!  
 (Al MENCIGUELA) Mi promesas al vi ke se vi postulos pli ol la prezon, kiun mi ĵus diris, vi ricevos de mi pli ol ducent batojn. Nun, diru: kioman prezon?  
 MENCIGUELA.—Tion, kion vi nomis, patro.  
 TORUVIO.—Dekkvar aŭ dekkvin denarojn?  
 MENCIGUELA.—Jes, patro.  
 AGUEDA.—Kion? Vi diris ankoraŭ “Jes, patro!” (*Ŝi batas sin*) Prenu tion, prenu tion, pro via malobeco!  
 TORUVIO.—Ne tuŝu la knabinon. . . .  
 MENCIGUELA.—He, patrino! he, patro! ne mortigu min!  
 ALOJO (*alvenante*).—Kio estas tio? Genajbaroj, kial vi tiel batas tiun ĉi knabineton?  
 AGUEDA.—Ho, sinjoro (*montrante sian edzon*), tiu ĉi malbonulo celas doni senpage ĉion, kion ni posedas; li tute volas ruinigi la domon. Olivoj tiel dikaj kiel juglandoj!  
 TORUVIO.—Per la prapatraj ostoj! Mi ĵuras ke ili ne estas eĉ tiel dikaj kiel milisemoj!  
 AGUEDA.—Sed mi certigas jese.  
 TORUVIO.—Sed mi neas tion, kion vi certigas.  
 ALOJO.—Nu, najbarino, volu aminde eniru domon. Mi prenas sur min paciĝi ĉion. (AGUEDA *foriras*). Klarigu por mi la aferon, nun, najbaro. Montru al mi viajn olivojn; eĉ se estas dudek cent funtoj, mi aĉetos la tuton.  
 TORUVIO.—Ne tiel estas, sinjoro; estas ne tiel, vere. Ni ne staras tiel antaŭe kiel vi pensas. La

olivoj ne estas en nia domo; ili nur estas sur nia bieno.

ALOJO.—Nu! venigu ilin tie ĉi; vi povas konfidi al mi; mi aĉetos la tuton je la plej rajta prezo.

MENCIGUELA.—La patrino postulas po du realoj por ĉiu buŝelo.

ALOJO.—Tio estas tre alta prezo.

TORUVIO.—Ĉu ne, sinjoro?

MENCIGUELA.—Patrino ne demandas pli ol dekkvin denarojn.

ALOJO.—Montru al mi specimenon.

TORUVIO.—Dio mia! Vi ne ŝajnas kompreni min, sinjoro. Mi tuj klarigos. Hodiaŭ, mi teren enmetis replantaĵon de olivarboj, kaj la edzino ĵus diris ke post ses aŭ sep jaroj oni povos kolekti kvar aŭ kvin centfuntojn da olivoj, ke ŝi mem kolektos, mi forportos, kaj nia filino vendos ilin, sed ke tiu ĉi ne devos postuli malpli ol du realojn: mi kontraŭstaris al tio; ŝi ree tian kondiĉon ripetis: tio estas la tuta afero.

ALOJO.—Mirinda afero, vere. Ĉu estas eble imagi tian okazon? Apenaŭ la olivujoj teren estas enmetitaj, kiam jam vi devigas vian filinon plori proili.

MENCIGUELA.—Vi estas pravega, sinjoro.

TORUVIO.—Ne ploru plu, Menciguela. Tiu ĉi infanino, sinjoro, valoras sian propran orpezon. Nun, filineto mia, iru pretigi la manĝilon; mi promesas, ke mi aĉetos por vi antaŭtukan el la vendprezo de la unuaj olivoj kiujn ni rikoltos.

ALOJO.—Adiaŭ, najbaro. Eniru domon ankaŭ, kaj pace vivu kun via edzino.

TORUVIO.—Saluton al vi, sinjoro.

ALOJO (*sola*).—Oni devas konfesi, ke en tiu ĉi mondo ni okazas vidas nekredblaĵojn! Tiuj geedzoj interinsultas unu la alian pri olivoj, kvankam eĉ la olivarboj ne kreskas ankoraŭ!

## LA DOMO DE ĴAK'.

Popola infana versaĵo, tradukita de J. T. Haxton.

Jen estas la domo konstruita de Ĵak'.  
 Jen estas la greno, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.  
 Jen estas la rato, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.  
 Jen estas la kato, kiu mortigis la raton, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.  
 Jen estas la hundo, kiu turmentis la katon, kiu mortigis la raton, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.  
 Jen estas la bovino kun kurba korno, kiu ĵetis la hundon, kiu turmentis la katon, kiu mortigis

la raton, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas tutsola la virgulino, kiu melkis la bovinon, kiu ĵetis la hundon, kiu, k.t.p.

Jen estas la viro, ĉifone vestita, kiu kisis la virgulinon tutsolan, kiu melkis, k.t.p.

Jen estas la preĝisto, tute razita, kiu edzigis la viron, ĉifone vestitan, kiu kisis, k.t.p.

Jen estas la koko, matene kriinte, kiu vekis la preĝiston, tute razitan, kiu edzigis, k.t.p.

Jen estas la farmamastro, grensemanta, kiu posedis la kokon, matene kriinte, kiu vekis, k.t.p., k.t.p., k.t.p., k.t.p., k.t.p.

## VIVIENO.

Duparta Ferakonto de E.W.

[Parto I.].—Meze de longa, larĝa vilaĝo staris dometo iom pli granda kaj, se tio estus ebla, pli pura ol la aliaj. Ĝi ŝajnis tiel hela, tiel blanka, kiel la neĝo, kaj la lunradioj ripozis sur ĝi tiel kviete kiel la pala feliĉulino en ĝi ripozis sin sur la mola lito inter la puraj blankaj bonodoraj drapoj. La virino estis tre, tre feliĉa.

Apud ŝi kuŝis mola, varma fasketo; ŝia novenaskita trezoro, la infaneto kiu devas aŭstataŭi karan sesjaran knabeton kiun, antaŭ ok jaroj, elmanĝis la lupoj.

La kompatindaj gepatroj nun konsoliĝis. La patrino dankeme pensis, ke ŝia edzo havis filon, kunlaboranton, kaj komforton, en sia aĝo kiam ŝi estos enterigita.

Poste envenis la patro, feliĉa kiel ŝi. La geedzaj kisis kaj benis la infaneton kaj preĝis al Dio kun kora, plena kaj trankvila ĝojego.

Dum la nokto, venteto ekblovis tra la fenestro super la lito sed la gepatroj ne vekigis.

Antaŭ ol tagiĝis, Davdo eliris, ĉar li devis tre frue konduki siajn bestojn al la paŝtejo, por ke ili ne tro malsatu, devigataj pasigi la tutan nokton inter la ter-muroj de la vilaĝo, for dela teruraj lupoj.

Ekvekiginte, Marta vidis sian—ne! ne estis ŝia, tiu ĉi bela blanka infanetino, jam havanta almenaŭ unu monaton, kiu mirante ĉirkaŭen rigardis!

Preskaŭ freneziginta pro ŝia perdo, la malfeliĉa patrino volis forĵeti la fremdulineton, sed la helaj bluj okuloj sin fiksas tiel konfidemaj sur ŝia vizaĝo, ke ŝi ne povis puni la senkulpan etulinon.

Dum ŝi kuŝis, multe plorinte, duonsvena, duondorma, pura lumo ekbrilis en la ĉambreto kaj voĉo pli dolĉa ol homa voĉo murmuris en ŝian oreton: “Ni estas ambaŭ mizeregaj, mi pleje, ĉar vi povis plori, mi ne povis, kaj vi rehavos vian knabeton, mi—mi nenion scias! Estu do bona kontraŭ mia idino, kaj mi estos bona kontraŭ via ido.” La lumo tiam malaperis.

Davdo revenis hejmen kun la anonco, ke la pastro venos morgaŭ por bapti la novenaskitan knabon. Li aŭdis kun mirego kaj teruro la rakonton de sia edzino. Post longa konsiliĝo, ili decidis nenion diri al la pastro pri ĉio, kio okazis. Li estis maljunulo, kaj loĝis tre malproksime, kaj nur vidis la vilaĝanojn por bapti, edzigi aŭ enterigi. La najbaroj estis amikoj, kaj ne babilus pri alies aferoj, se ne estus necese.

Post multa pripenso la gepatroj elektis el antikva idola kanto la nomon Vivieno, kaj la pastro sen ŝanceliĝo ĝin murmuris, baptante la infaninon.

Tiun nokton Marta songis, ke du belegaj

sinjorinoj staris apud la lulilo, unu el ili diris: “Estas bone, se ŝi havus animon senmortan, la bapto estas necesa; sed, se ŝi estus, kiel ni, sen animo, la bapto neniel malutilos.” La dua diris: “Mi petas, fratino, benu ŝin!”

La unua solene resumis: “Jen mia beno, mia baptodonaco: Multaj homoj ŝin amos, ŝi sopiros pri ĉies amo kaj, se iafoje ŝi amos, ŝi ne estos reamata.” Tiam okazis virina agonio ekkrio, kaj la lumo kaj sono neniigis.

Ofte Marto kredis aŭdi voĉojn nehomajn en la nokto. Unufoje ŝi kredis distingi la vortojn: “Se iam ŝi vidos la belecon perfektan, ŝi ĝin amos kaj eterne estos feliĉa.”

Kiam Marto resaniĝis kaj rekomencis sian ĉiutagan laboron, neniam ŝi vidis lumon nokte nek aŭdis mirindan voĉon. Davdo nenion aŭdis, eĉ li ne kredis je la songoj de la edzino; tamen li baldaŭ ekamis la blankan, ĝentilan Vivienon, kaj estis bonega kontraŭ ŝi. La vivo de la tuta familio estis, dum dekkvar jaroj, trankvila kaj prospera.

Vivieno farigis la anĝelo de la vilaĝo. Ŝia beleco ĉarmis ĉiajn okulojn; ŝia dolĉa voĉo ravis ĉiajn orelojn; ŝia kvieta kaj ĝentila karaktero, ŝia honesta konduto kaj ŝia senegala submetiĝo al la plenkreskuloj kaj, precipe, al la maljunuloj, gajnis je ŝi la aprobon de la saĝuloj. Ŝia viveco, granda kurajo, ŝia lerta spirito, ŝia ŝercado igis ŝin la idolo de la junaj. Ĉiuj amegis ŝin; ŝi ĉiujn egale amis, tute kiel ŝi amis bestojn, birdojn, florojn, insektojn mem! Ŝi volis ja bonfari al la tuta kreitaĵo de la bona Dio. Ofte ŝi levis limakon el polva truo kaj alportis ĝin al la mola herbejo. La brutoj sciis, ke ŝi amis ilin, de malproksime ili rekonis ŝin. Ĉevaloj, bovidoj, azenoj kaj hundoj venis por ricevi ŝiajn karesojn, kaj ludis, saltante ĉirkaŭ ŝi; ofte eĉ sciuro volonte sin lasis fali el arbo en ŝiaj brakoj, mem la porkoj tre rapide kuris, por ke ŝi gratu iliajn molajn sentemajn orelojn! Jes, Vivieno estis feliĉa knabino! Sed, ho ve! ne ĉiamaj estas belaj tagoj!

Unu matenon ŝi eliris por viziti malsanan najbarinon, kaj ŝi neniam revenis.

Longe serĉadis ĉiuj, sed vane, kaj malĝojo estis en ĉies koro, pleje ĉe ŝiaj nutra-gepatroj, kiuj dum multaj tagoj ploradis.

Post unu semajno alvenis ĉe ili junulo strange vestita sed bela kaj forta. Li ĉirkaŭprenis silento Davdon, genufleksis apud la piedoj de Marto kaj kisis ŝiajn manojn. La geedzaj sciis, ke estas ilia longatempe perdita infano, kaj ili laŭte ĝojegis. Sed neniam povis ili forgesi la bonan, belan Vivienon.—*Finota.*

MENCIGUELA.—Jes, mia patro.

AGUEDA.—Kion? “Jes, mia patro.” Venu, tie ĉi, filineto. Kion vi demandas por la olivoj?

MENCIGUELA.—Tion, kion vi volos, patrino.

AGUKDA.—Du Kastiliajn realojn?

TORUVIO (*kolere*).—Kompaton! Du realojn!  
(Al MENCIGUELA) Mi promesas al vi ke se vi postulos pli ol la prezon, kiun mi ĵus diris, vi ricevos de mi pli ol ducent batojn. Nun, diru: kioman prezon?

MENCIGUELA.—Tion, kion vi nomis, patro.

TORUVIO.—Dekkvar aŭ dekkvin denarojn?

MENCIGUELA.—Jes, patro.

AGUKDA.—Kion? Vi diris ankoraŭ “Jes, patro!” (*Ŝi batas sin*) Prenu tion, prenu tion, pro via malobeo!

TORUVIO.—Ne tuŝu la knabinon.

MENCIGUELA.—He, patrino! he, patro! ne mortigu min!

ALOJO (*alvenante*).—Kio estas tio? Genajbaroj, kial vi tiel batas tiun ĉi knabineton?

AGUEDA.—Ho, sinjoro (*montrante sian edzon*), tiu ĉi malbonulo celas doni senpage ĉion, kion ni posedas; li tute volas ruinigi la domon. Olivoj tiel dikaj kiel juglandoj!

TORUVIO.—Per la prapatraj ostoj! Mi ĵuras ke ili ne estas eĉ tiel dikaj kiel milisemoj!

AGUEDA.—Sed mi certigas jese.

TORUVIO.—Sed mi neas tion, kion vi certigas.

ALOJO.—Nu, najbarino, volu aminde eniru domon. Mi prenas sur min paciĝi ĉion. (AGUKDA foriras). Klarigu por mi la aferon, nun, najbaro. Montru al mi viajn olivojn; eĉ se estas dudek cent funtoj, mi aĉetos la tuton.

TORUVIO.—Ne tiel estas, sinjoro; estas ne tiel, vere. Ni ne staras tiel antaŭe kiel vi pensas. La

olivoj ne estas en nia domo; ili nur estas sur nia bieno.

ALOJO.—Nu! venigu ilin tie ĉi; vi povas konfidi al mi; mi aĉetos la tuton je la plej rajta prezo.

MENCIGUELA.—La patrino postulas po du realojn por ĉiu buŝelo.

ALOJO.—Tio estas tre alta prezo.

TORUVIO.—Ĉu ne, sinjoro?

MENCIGUELA.—Patro ne demandas pli ol dekkvin denarojn.

ALOJO.—Montru al mi specimenon.

TORUVIO.—Dio mia! Vi ne ŝajnas kompreni min, sinjoro. Mi tuj klarigos. Hodiaŭ, mi teren enmetis replantaĵon de olivarboj, kaj la edzino ĵus diris ke post ses aŭ sep jaroj oni povos kolekti kvar aŭ kvin centfuntojn da olivoj, ke ŝi mem kolektos, mi forportos, kaj nia filino vendos ilin, sed ke tiu ĉi ne devos postuli malpli ol du realojn: mi kontraŭstaris al tio; ŝi ree tian kondiĉon ripetis: tio estas la tuta afero.

ALOJO.—Mirinda afero, vere. Ĉu estas eble imagi tian okazon? Apenaŭ la olivujoj teren estas enmetitaj, kiam jam vi devigas vian filinon plori pro ili.

MENCIGUELA.—Vi estas pravega, sinjoro.

TORUVIO.—Ne ploru plu, Menciguela. Tiu ĉi infanino, sinjoro, valoras sian propran orpezon. Nun, filineto mia, iru pretigi la mangilaron; mi promesas, ke mi aĉetos por vi antaŭtuton el la vendprezo de la unuaj olivoj kiujn ni rikoltos.

ALOJO.—Adiaŭ, najbaro. Eniru domon ankaŭ, kaj pace vivu kun via edzino.

TORUVIO.—Saluton al vi, sinjoro.

ALOJO (*sola*).—Oni devas konfesi, ke en tiu ĉi mondo ni okazas vidas nekredblaĵojn! Tiuj geedzoj interinsultas unu la alian pri olivoj, kvankam eĉ la olivarboj ne kreskas ankoraŭ!

## LA DOMO DE ĴAK'.

Popola infana versaĵo, tradukita de J. T. Haxton.

Jen estas la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas la greno, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas la rato, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas la kato, kiu mortigis la raton, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas la hundo, kiu turmentis la katon, kiu mortigis la raton, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas la bovino kun kurba korno, kiu ĵetis la hundon, kiu turmentis la katon, kiu mortigis

la raton, kiu manĝis la grenon, kiu restis en la domo konstruita de Ĵak'.

Jen estas tutsola la virgulino, kiu melkis la bovinon, kiu ĵetis la hundon, kiu, k.t.p.

Jen estas la viro, ĉifone vestita, kiu kisis la virgulinon tutsolan, kiu melkis, k.t.p.

Jen estas la preĝisto, tute razita, kiu edzigis la viron, ĉifone vestitan, kiu kisis, k.t.p.

Jen estas la koko, matene kriinte, kiu vekis la preĝiston, tute razitan, kiu edzigis, k.t.p.

Jen estas la farmamastro, grensemanta, kiu posedis la kokon, matene kriinte, kiu vekis, k.t.p., k.t.p., k.t.p., k.t.p., k.t.p.

## VIVIENO.

Duparta Ferakonto de E.W.

[*Parto I.*].—Meze de longa, larĝa vilaĝo staris dometo iom pli granda kaj, se tio estus ebla, pli pura ol la aliaj. Ĝi ŝajnis tiel hela, tiel blanka, kiel la neĝo, kaj la lunradioj ripozis sur ĝi tiel kviete kiel la pala feliĉulino en ĝi ripozis sin sur la mola lito inter la puraj blankaj bonodoraj drapoj. La virino estis tre, tre feliĉa.

Apud ŝi kuŝis mola, varma fasketo; ŝia novenaskita trezoro, la infaneto kiu devas austatati karan sesjaran knabeton kiun, antaŭ ok jaroj, elmanĝis la lupoj.

La kompatindaj gepatroj nun konsoligis. La patrino dankeme pensis, ke ŝia edzo havos filon, kunlaboranton, kaj komforton, en sia aĝo kiam ŝi estos enterigita.

Poste envenis la patro, feliĉa kiel ŝi. La geedzoj kisis kaj benis la infaneton kaj preĝis al Dio kun kora, plena kaj trankvila ĝojego.

Dum la nokto, venteto ekblovis tra la fenestro super la lito sed la gepatroj ne vekigis.

Antaŭ ol tagiĝis, Davdo eliris, ĉar li devis tre frue konduki siajn bestojn al la paŝtejo, por ke ili ne tro malsatu, devigataj pasigi la tutan nokton inter la ter-muroj de la vilaĝo, for de la teruraj lupoj.

Ekvekiĝinte, Marta vidis sian—ne! ne estis ŝia, tiu ĉi bela blanka infanetino, jam havanta almenaŭ unu monaton, kiu mirante ĉirkaŭten rigardis!

Preskaŭ frenezigiĝinta pro ŝia perdo, la malfeliĉa patrino volis forjeti la fremdulineton, sed la helaj blujaj okuloj sin fiksas tiel konfidemaj sur ŝia vizaĝo, ke ŝi ne povis puni la senkulpan etulinon.

Dum ŝi kuŝis, multe plorinte, duonsvena, duondorma, pura lumo ekbrilis en la ĉambreto kaj voĉo pli dolĉa ol homa voĉo murmuris en ŝian oreleon: “Ni estas ambaŭ mizeregaj, mi pleje, ĉar vi povis plori, mi ne povis, kaj vi rehavos vian knabeton, mi—mi nenion scias! Estu do bona kontraŭ mia idino, kaj mi estos bona kontraŭ via ido.” La lumo tiam malaperis.

Davdo revenis hejmen kun la anonco, ke la pastro venos morgaŭ por bapti la novenaskitan knabon. Li aŭdis kun mirego kaj teruro la rakonton de sia edzino. Post longa konsiliĝo, ili decidis nenion diri al la pastro pri ĉio, kio okazis. Li estis maljunulo, kaj logis tre malproksime, kaj nur vidis la vilaĝanojn por bapti, edzigi aŭ enterigi. La najbaroj estis amikoj, kaj ne babilus pri alies aferoj, se ne estus necese.

Post multa pripenso la gepatroj elektis el antikva idola kanto la nomon Vivieno, kaj la pastro sen ŝanceliĝo ĝin murmuris, baptante la infaninon.

Tiun nokton Marta songis, ke du belegaj

sinjorinoj staris apud la lulilo, unu el ili diris: “Ĝi estas bone, se ŝi havus animon senmortan, la bapto estas necesa; sed, se ŝi estus, kiel ni, sen animo, la bapto neniel malutilos.” La dua diris: “Mi petas, fratino, benu ŝin!”

La unua solene resumis: “Jen mia beno, mia baptonaco: Multaj homoj ŝin amos, ŝi sopiros pri ĉies amo kaj, se iafoje ŝi amos, ŝi ne estos reamata.” Tiam okazis virina agonio ekkrio, kaj la lumo kaj sono neniigis.

Ofte Marto kredis aŭdi voĉojn nehomajn en la nokto. Unufoje ŝi kredis distingigi la vortojn: “Se iam ŝi vidos la belecon perfektan, ŝi ĝin amos kaj eterne estos feliĉa.”

Kiam Marto resaniĝis kaj rekomencis sian ĉiutagan laboron, neniam ŝi vidis lumon nokte nek aŭdis mirindan voĉon. Davdo nenion aŭdis, eĉ li ne kredis je la songoj de la edzino; tamen li baldaŭ ekamis la blankan, ĝentilan Vivienon, kaj estis bonega kontraŭ ŝi. La vivo de la tuta familio estis, dum dekkvar jaroj, trankvila kaj prospera.

Vivieno fariĝis la anĝelo de la vilaĝo. Ŝia beleco ĉarmis ĉiajn okulojn; ŝia dolĉa voĉo ravis ĉiajn orelojn; ŝia kvieto kaj ĝentila karaktero, ŝia honesta konduto kaj ŝia senegala submetiĝo al la plenkreskuloj kaj, precipe, al la maljunuloj, gajnis je ŝi la aprobon de la saĝuloj. Ŝia viveco, granda kuraĝo, ŝia lerta spirito, ŝia ŝercado igis ŝin la idolo de la junaj. Ĉiuj amegis ŝin; ŝi ĉiujn egale amis, tute kiel ŝi amis bestojn, birdojn, florojn, insektojn mem! Ŝi volis ja bonfari al la tuta kreitaĵo de la bona Dio. Ofte ŝi levis limakon el polva truo kaj alportis ĝin al la mola herbejo. La brutoj sciis, ke ŝi amis ilin, de malproksime ili rekonis ŝin. Ĉevaloj, bovidoj, azenoj kaj hundoj venis por ricevi ŝiajn karesojn, kaj ludis, saltante ĉirkaŭ ŝi; ofte eĉ sciuro volonte sin lasis fali el arbo en ŝiaj brakoj, mem la porkoj tre rapide kuris, por ke ŝi gratu iliajn molajn sentemajn orelojn! Jes, Vivieno estis feliĉa knabino! Sed, ho ve! ne ĉiamaj estas belaj tagoj!

Unu matenon ŝi eliris por viziti malsanan najbarinon, kaj ŝi neniam revenis.

Longe serĉadis ĉiuj, sed vane, kaj malĝojo estis en ĉies koro, pleje ĉe ŝiaj nutra-gepatroj, kiuj dum multaj tagoj ploradis.

Post unu semajno alvenis ĉe ili junulo strange vestita sed bela kaj forta. Li ĉirkaŭprenis silente Davdon, genufleksis apud la piedoj de Marto kaj kisis ŝiajn manojn. La geedzoj sciis, ke estas ilia longatempce perdita infano, kaj ili laŭe ĝojegis. Sed neniam povis ili forgesi la bonan, belan Vivienon.—*Finota.*

[Author's Copyright.]

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*Antaŭparolo.*

Kiel en suna kampo infano kolektas florojn, tiel vagante en la kampo de miaj memoroj mi kolektas miajn memorojajn; kunmetante ilin tute senarte, ne aranĝante ilin laŭ ia ajn metodo sed ĉiam prenante tiun kiu min plej altiras ĉe la momento mem. Se vi, mia legantaro, deziras artefaritan bukedon, vi ne rigardu miajn florojn. Tamen mi prezentas ilin kun tre kora deziro ke ili interesos kaj plaĉos al vi.

\* \* \* \*

### UNUA FRAGMENTO: LA ŜTATOJ.

Antaŭ multaj jaroj mi vizitis Unuigitajn Ŝtatojn de Ameriko.

Fermante la okulojn mi revidas la vilaĝon, unu el tiuj fungaj vilaĝoj kiuj tiel ofte troviĝas en la Ŝtatoj. De la loko kie nun ĝi staras, ne estis antaŭ nur unu jaro eĉ unu domo pli proksima ol dudek mejloj, sed nun (t.e., ĉe la tempo kiam mi tien alvenas) ĝi posedas du Bankojn, du legistojn, kuraciston, gazeton kaj du stacidomojn. Proksime de ĝi ankoraŭ restas negranda arbaro, sed tiel rapide la arboj fariĝas domoj ke, laŭ ĉiu kredindeco, ĝi post nelonge tute malaperiĝos.

“Kiom da tempo vi pensas atendi,” mi demandas al Amerikano, “de kiam vi unue pripensis konstruigi domon ĝis kiam vi estas en ĝi loĝanta?”

“Nu, fremdulo,” li respondis, “se mi atendus du semajnojn mi pensus ke mi tre longe atendis.”

De tri tagoj la vetero estas varmega. En ombro la termometro montras 104°, 105° kaj hodiaŭ 107° Farenheite (ĉirkaŭ 42° centgrade).

En ĉambreto de unu el la lignaj domoj mi kuŝas, malpezege vestita, sur lito, ventumante min per du grandaj ventumiloj.

Apud la lito troviĝas tableto portanta grandan kruĉon da glacia akvo (t.e., akvo en kiun oni estas metinta glacieron) kaj glason. Mi estas soifa kaj mi ofte trinketas.

Tiel malgranda estas la ĉambreto ke, etendinte la manon, mi facile tuŝas la muron kies varmega ligno bruldoloras mian haŭton.

Tra la fenestro, larĝe malfermita, eniras zumo

de “*cimoj*” (“*cimo*,” kun aldono de priskriba vorto estanta Amerikana por ĉiu fluga insekto), kaj okaza frapo de iu grandega sed mallerta muŝo kontraŭ la metalfadena reto kiu kovras la fenestron ekstere.

Por ne Amerikanaj legantoj mi klarigos la frazon. Dum somero la insekta vivo estas multega en la Ŝtatoj. Oni do streĉas sur trajtojn metal-fadenan reton kaj alfiksis la trajtojn ekstere de la fenestroj kaj pordoj. Por tiuj ĉi lastaj alfik-sante al la trajtoj ĉarnojn oni faras kvazaŭ eksteran pordon, kaj en—aŭ elirante ĉambrojn oni ĉiam zorge fermas la unuan pordon antaŭ ol malfermi la alian.

Kiel necesaj ili estas du ekzemploj montri:— Mi mem vidis la ambaŭ. (1). Foje en domo, kie la reto estas ŝirita, tuj kiam oni ekbruligis lampon en unu momento, arego da insektoj dense kovras la supraĵon de la tablo, kvankam la disŝiraĵo estis tre malgranda. (2). En farma domo la familianoj laŭ vico ŝvingis dum la manĝoj branĉeton supre de la tablo, sed malgraŭ tio la muŝoj preskaŭ kovris la manĝaĵojn.

En ĉiuj miaj memoroj pri Ameriko intermiksas la zumegon de insektarego.

Sed nun mi estas trinkinta la tutan enhavon de mia kruĉo kaj ankoraŭ mi soifas. Antaŭ miaj okuloj alvenas alloga vidaĵo, tiu, nome, de la sodakvujo ĉe la drogisto.

Mi vidas meze de la ujo la kranegon por la sodakvo, kaj laŭlonge la vicon da kranetoj por la diversaj gustoj; mi vidas la homaron kaj la glason, kaj mi aŭdas la siblon de la ŝaŭmanta trinkaĵo.

En tiu ĉi vilaĝo [pardonu, ho! Amerikanoj; “urbo”] estas nur unu apoteko, kaj mi ridas memorante la aregon de malkontentigitaj soifuloj kiujn mi vidas foje kiam la sodakvujo rompiĝis. Sed mi estas mem soifulo, kaj iom mi komprenas la soifegon de drinkulo.

Inter soifo kaj inercia komencas neegala barakto: neegala ĉar la soifo estas ĉiama kreskanta forto.

Leviĝinte mi vestas min, kaj, kunprenante sunombreleton, eliras el la domo sur la lignan flankpromenejon.—(*Daŭrigota*).

## NEKROLOGIO.

Kun grandega bedaŭro ni anoncas la morton de nia sindonema kunverkanto Doktoro A. Milner en Trinidad. Ĉiam preta helpi ĉiujn, li estis multe estimata kaj amata en la insulo, kaj ĉiuj, precipe la Esperantistoj, kunsendos plej sinceran simpatieon al lia sengepatra fileto, kaj al ĉiuj parencoj. Ĝus antaŭ la morto, li deziris ke ni anoncu ĝin, por ke la Esperantistoj ne plu sendus lĉterojn al Mayaro.

## KIAM EKFLORADAS REZEDOJ.

## Pentraĵeto el Rusa Litvujo.

Originale en Esperanto, verkita de Osip Ivanovic Elleder.

Ĉiujare kiam la bonodoro de rezedoj dolĉigadas aeron en mia ĝardeno, mi devas pensi pri mia mortinta amiko Leonid Leonidoviĉ.

Li estis iom strangulo, mia kompatinda amiko, sed li estis homo tute bonkora, toleranta kaj indulganta ĉiujn, faranta al neniu iajn malagrablaĵojn. Li loĝis en proksimeco de mia loĝloko, tiel ke ni tre ofte povis vidi unu la alian. Li staras kvazaŭ antaŭ miaj okuloj; homo en mezaaĝo, inter liaj malblondaj haroj troviĝis eĉ kelkaj argentaj, kvankam li nepre ne estis maljunulo. El lia pala, mallarĝformita vizaĝo rigardis du mallumaj, senfine malgajaj okuloj. Li vivadis tute sole, multe paroli li ne amis, tial, kvankam ni ofte kunvenadis mi do neniam aŭdis de li ion pli detalan pri lia pasinta vivo.

Li estis en nia provinco nur antaŭ kelkaj jaroj alveninta, sed ĉar li, kiel mi jam diris, al neniu estis farinta malbonaĵojn, oni kutimiĝis kun li, eĉ kun liaj iom strangaj manieroj kaj lasis lin vivi laŭ lia volo.

Al liaj strangaĵoj apartenis ankaŭ la kutimo fari ĉiu vespere vastajn promenadojn, prefere en lokojn izolitajn, kaj se estis ĉielo klara, sennuba, tiam li revenadis hejmen nur frumatene kiam la nokta firmamento ekpaliĝis. Tiuj malmultaj homoj, al kiuj sukcesis observi lin dum la suprediritaj promenadoj (sed tio okazis nur tre malofte, ĉar li ĉiam elektadis lokojn trankvilajn, senhomajn por siaj promenoj), rakontis ke li tiam laŭtvoĉe paroladas kun si mem, kvazaŭ havante ian nevideblan akompananton.

Preter mia loĝloko fluas la rivero Ŝeŝupa<sup>1</sup> per multegaj kurbigoj tra la herbejoj kaj kamparoj peniganta atingi la maron.

La bordoj de ĝi troviĝas ofte tre altaj kaj krutaj, kelkaj el tiuj krutaĵoj estas kovritaj per densaj arbetaroj, kaj en la printempo kaj somero multkolorigitaj per miloj da diversaj kampfloretoj. La unuajn violojn oni trovadas tie, kies floretoj, palbluaj, kiel nia norda ĉielo, elspiradas kvankam malpli fortan, tamen delikatan bonodoron,<sup>2</sup> kaj kiam la somero kun liaj varmigantaj sunradioj aperas, balanciĝas tie sur graciaj trunketoj lumbluaj sonoriletoj de grandfloraj kampanuloj kaj heliĝas sangruĝaj. lihnisoj, *larvoj de Dia patrino*, nomas ilin la popolo. Multaj najtingaloj kantadas en densa branĉaro siajn dolĉajn amkantojn kaj la kvieti murmurado de plaŭdantaj ondoj harmonie akompanadas ilin. Estas ĉarmegaj tiuj bordoj de Ŝeŝupa-rivero en Litvalando!

Alte sur unu de tiuj krutaĵoj, sur la granda, muskkovrita ŝtono jam de kelkaj jaroj havis sian sidejon freneza knabino el unu de proksimaj kolonioj. La frenezulino estis tute orfiĝinta, ŝiaj gepatroj estis mortintaj, kaj ŝi vivadis ĉe sia onklo, malriĉa posedanto de kelkaj malgrandaj kampetoj. Sed ŝi loĝadis ĉe li nur dum la severa vintra sezono: kiam al fino de monato Marto aŭ Aprilo la varmetaj ventoj komencis fluidigi la neĝamasojn, kiam alte en la aero la unuaj alaŭdoj estis aŭdataj kaj aperis la sovaĝaj anseroj, tiam ŝi forlasis malluman ĉambreton en la dometo de sia onklo kaj—malaperis.

Ŝi vagadis tiam ne timante ankoraŭ ofte tre malvarman veteron—ŝi neniam vestiĝis varme—tra la herbejoj kaj kampoj serĉante florojn. Malfeliĉulino, ŝi devis longe serĉi ĝis ŝi trovis iaĵn ĉar en nia lando la printempo nur malrapide aperadas. Ŝi tial vagadis longe kaj malproksimen; sed kiam nur ekverdiĝis la Ŝeŝupa-bordoj tiam oni kun plena certeco povis ŝin trovi sur la suprenomita granda ŝtono.

Tie sidis ŝi plej multe senmove, verdan florkronon sur la kapo, kies densaj, nigraj haroj estis senorde sur la ŝultroj falantaj. Ŝia malriĉa vestaĵo estis plibeligita per floroj kaj verdaj branĉetoj kiuj ĉie, kie nur eble, estis alfortigitaj. Apud ŝi sur la ŝtonplato kuŝadis bukedoj de kampfloroj. Ŝi restadis je Ŝeŝupa-bordoj tage kaj nokte, nur la plej turmentiganta malsato devigis ŝin foriri. Tiam ŝi iris aŭ hejmen, aŭ en ian proksiman kolonion<sup>3</sup>; silente alveninte, ŝi timeteme haltis antaŭ la fenestro, aŭ apud la pordo de dometo kaj nenion petante, nenion dirante staris ŝi tie tiel longe: ĝis iu el la domgelogantoj, kiuj ĉiuj ŝin konis, komplete donacis al ŝi iom da manĝado. Satiĝinte kaj, provizite kun peco da pano, sendanke, silente, kiel ŝi alvenis, ŝi ree timeteme kiel arbarbirdeto malaperis.

Nur nokte ŝi fariĝis pli rimarkebla. Ĉu luma ĉu malluma estis la nokto, ĉu agrabla vetero regadis aŭ ĉu ventego kriegis kaj pluvego siajn akvojn teren verŝis, egale, ĉiutage oni aŭdadis ŝian kantadon de la krutaĵo super la Ŝeŝupa-rivero.

Ŝia kanto en Litva lingvo—ŝi posedis rimarkinde klaran, belan voĉon—jen mallaŭte, apenaŭ aŭdeble, jen laŭtvoĉe eksonante, havis tian tireman, melankolian finrimon kiu estas propra al ĉiuj Litvaj kantoj, eĉ al kantoj kun ĝoja aŭ petola enhavo.

En noktoj trankvilaj, kiam la luno superarĝentigis

la tutan ĉirkaŭaĵon, kaj sur la rivera supraĵo aperadis multaj dancantaj lumetoj: steloj repeguligantaj en saltantaj ondoj, tiam sonis la voĉo de freneza knabino kiel mistera kanto de akvoŝeino kiu nokte eliras por promeni en pala brilo de luno super la dormantaj, rosofreŝaj herbejoj.

Se iu malfruiginta fremdulo estis tiam en verda densejo trovinta frenezulinon, kiel ŝi, florornamita, sur la altaŝtono sidis, aŭ se li en malcerta lunlumo estis sur la riverbordo renkontinta ŝin, glitantan tien mistere, mallaŭte, kun alte leviĝintaj manoj—li sendube estus kredinta, ke li vidis aŭ feinson de akvoj aŭ alian noktan fantomon.

La frenezulinon ĉiuj ĉirkaŭuloj konis kaj ĉar ŝia farado estis tute sendanĝera kaj neniu malutiliganta, oni lasis ŝin libere vagadi, florojn deŝiradi kaj loĝadi sur la riverbordo. Tiamaniere ŝi vegetadis de neniu maltrankviligita, forlasita de ĉiuj. Nur unufoje en ĉiuj jaro ŝi furioziĝis. Tio estis en komenco de vintro kiam ŝia onklo ŝin devis kapti kaj perforte forkonduki de ŝia amata placeto por ke ŝi ne frostigu. Tiam tiu ĉi knabino pacema, trankvila, fariĝis furiozega. Oni devis ŝin kun ŝnuregoj kunligigi kaj dum du aŭ tri tagoj ŝi devis resti en la domo alligita. Post tiu tempo

ŝi ree fariĝis trankvila, pacema kaj obeema kaj senkontraŭstare restadis nun hejme. Ŝi eĉ en tiu sezono fariĝis pli prudenta kaj helpis je diversaj pli facilaj domlaboroj.—Sed kiam en la naturo nur la unuaj printempaj antaŭsentoj aperis, kaj la alaŭdoj revenis el sudaj landoj, tiam forlasis ŝi tuj la hejmon kaj vivis ree libere kiel birdo de kampoj sur sia ŝtono; kantante kaj florojn deŝirante.—Tiam ree, de apenaŭ ekverdiĝintaj bordoj, en trankvilaj noktoj, post longa interrompo, malproksimen estis aŭdebla ŝia kantado, kaj la infanaro en la najbaraj kolonioj ĝojĝante elvokadis: “*Taŭ dor grajt alleks garnis ir lakŝtingala, durnovoĉe jaŭ gieda!*” (Nun jam baldaŭ alflugos cikonioj kaj najtingaloj, la frenezulino jam kantas!).

(*Daŭrigota.*)

<sup>1</sup> Ŝesuppe = Litva vorto, signifas “*sesriveroj*” ĉar ses fontoj kunigintaj formas ĝian komencon. <sup>2</sup> *Viola mirabilis*. <sup>3</sup> Litvaj kolonioj estas unuopaj vilaĝaj mastrajoj kun bezonaj konstruaĵoj izolite starantaj. Vilaĝoj en senco de kunegrupitaj domoj de kelkaj vilaĝanoj ne ekzistas ĉi tie.

## PROFESORO VULPO.

Tradukita de E. J. Catt.

Maljuna vulpo tre klera, tre elokventa, devigis pro malforteco, sin doni tute al spiritaĵoj aferoj. Li komencis prediki al la loĝantoj de la arbaroj. Lia elokventeco estis pasia, lia moraleco neriproĉinda. La konstatis per la plej konvinkanta logiko ke, per simplaj honestaj manieroj oni povas facile atingi, kaj ĝui, feliĉecon. “Male,” li diris, “la vana mondo nin allogas, nin trompas, nin devigas multe pagi por ĝiaj artifikaj proponoj kaj promesoj, kiujn ĝi neniam plenumas, sed ĉiam fortiras de ni.”

Tamen, nia profesoro malprosperis, tute ne sukcesis; neniu venis lin aŭskulti, krom kelkaj maljunaj religiaj cervinoj, kiuj loĝis en kvieteco kaj povis nenion fari por helpi je sia progresado.

Kion li do faris?

Li decidis ŝanĝi sian temon. Li do komencis kondamni la kutimojn de rabo, la soifo por buĉado kiun posedas la ursoj, tigroj kaj leonoj. De nun li altiris amasojn da aŭskultantoj: cervoj, kapreoloj, gazeloj, ĉiuj trovis mil ĉarmojn en liaj paro-

ladoj. Baldaŭ li gajnis reputacion, oni povas eĉ diri iom da famo, tiel ke maljuna, pia, bonvola leono, Reĝo de la lando, multe deziris lin vidi, lin aŭdi.

La vulpo raviĝis sin prezenti ĉe la kortego de la reĝo.

Li alvenis, predikis. Li vere superis sin! Li solene denoncis la kruelegecon de bestoj. Li paroladis pri la dia furiozo, venĝo, kaj kolerego kiu devas frue aŭ malfrue fali sur ĉiuj el ili.

La korteganoj miris pro tia maltimo, kaj rigardis unu la alian sen ion dirante, ĉar la reĝo ŝajnis plaĉata pro tiu ĉi ne ordinara sincereco.

La prediko finite, la reĝo alvokis la oratoron. La monarĥo diris al li: “Vi sukcesis min plaĉi, vi montris al mi la veron. Mi ŝuldas al vi justan rekompencojn; kion vi demandas kiel premio por via instruado?”

Kaj la vulpo respondis: “Ho, Via Reĝo Moŝto, kelkajn meleagrojn!”

Sabatan posttagmezon knabeto sidis sur rivera bordo fiŝkaptante, kiam homo venis a li kaj demandis:

“Kiom da tempo vi estas tie ĉi?”

“Preskaŭ du horojn.”

“Kiom da fiŝoj vi estas kaptintaj?”

“Ho! se mi kaptos tiun ĉi fiŝon, kaj alian, mi havos du!”—(9929).



## HO VE! NI VIROJ.

Ho, kompatindaj Esperantistoj! Ĉu ja povas esti vere ke ni, senkonaj kaj senspertaj viroj, sendis al vi recepton por fari Kristnaskan Pudingon sen la ĉefa enhavaĵo—sen la sekvinberoj?! Humilege ni petas vian pardonon. Ni, la Redaktoro kaj la Presistoj, eluzis tutan funton da sekvinberoj, anstataŭ ol permesi, ke ili estu duonigitaj kaj elgrajnitaj, por ke ili plibonigu la belan pudingon. Kaj, ne kontenta pro tiu ĉi, ni ankaŭ eluzis duonfunton da riboj.

Ni memoras ke, foje, ĉarma knabino diris al ni ke: "Kiso sen lipharoj estas kiel ovo sen salo!" kaj nun ni lernis ke: "Kristnaska pudingo sen sekvinberoj estas kiel Hamleto sen la Princo de Danujo!"

Kvankam la dua estas eble tiel stranga elpensajo kiel la unua, ni tute konsentas pri ĝi, sed, pri la liphara-sala afero ni, malfeliĉaj viroj, ne povas juĝi.

Nu do, vi feliĉaj legantinoj, kiuj ne ankoraŭ faris viajn Pudingojn, memoru ke oni devas enmeti ankaŭ unu funton da sekvinberoj, kaj unu kaj duonon da riboj.

Ni nun havas la plezuron aldoni la recepton, verkita de la sama afabla legantino, S<sup>ri</sup>no Jem Ross Archibald, por la faro de *Novjara Haketaĵo* (Angle, *mincmil*).

*Materialo.*—1½ funtoj da Riboj (Lavitaj kaj sekigitaj).  
1 da sekvinberoj (sen la grajnoj).  
¼ da Miksitaj Kanditaj Ŝeloj (dihaketitaj).  
1½ da Pomoj (ŝelitaj kaj senkoraj).  
¾ da Bovaĵsebo (haketu en pecetojn).  
Triono da raspita muskato.  
½ unco da Cinamono (pudrita).  
½ unco da Zingibro (pudrita).  
½ unco da Ĉiuj Spicoj (pudrita).  
Duon-teokulero da kariofiloj.  
¾ funto da Mola sukero.

*Metodo.*—Haketu ĉion (oni ne povas haketi tro). Malsekigu per du vinglasoj da brando. Metu la miksaĵon en botelojn, kovru ilin per papero malsekita en brando. Poste kovru ilin per seka papero kaj ligu per ŝnureto.

*Kiamaniere ĝin uzi.*—Kovru kun malpeza pasteco, surmetu iom da la haketaĵo, malseku la randojn de le telero per lakto, pinĉu la randojn poste kovru ĉion per pasteco.

Ŝmiru kun ovblanko kaj metu pudritan sukeron sur la supraĵo, traboru en la mezo, por permesi ke la aero trapasu.

Baku en rapida forno dum ĉirkaŭ dudek minutoj, ĝis ĉiuj estos palbrunaj. Metu ilin (varmegaj) sur varmaj teleroj.

## SKOTA PERSISTO.

Originale verkita de F. A. Meigh.

La persisto de la Skotoj ĉiam estas figurata al ni dum nia juneco per la fabelo de "Bruco kaj la Araneo." Ni ĉiuj scias kiel la malfeliĉa reĝo rigardis la unuan kaj la duan vanan penadon de la araneo ŝpini teksaĵon, kaj, kiam la insekto trafis la trian fojon, la reĝo decidigis ankaŭ fari trian penadon forpeli la malamikojn. Kompreneble li ankaŭ sukcesis.

Mi devigis memori tion ĉi kiam mi vizitis Skotlandon antaŭ kelkaj tagoj.

Mi estis fotografinta kelkajn antikvajn skulptitajn tombaĵojn ĉe Stirlinga preĝejo-korto kaj mi subite ekvidis vespejon tute proksime al mi.

Apenaŭ mi formovis, kiam ok aŭ naŭ malgrandaj nudkruraj infanoj alvenis kaj, ekvidante la vespejon, komencis ĝin inciti per bastonoj.

Kompreneble la vespoj malsategis tiun ĉi malafablan agon, kaj montris sian koleregon pikantaj la krurojn kaj vizaĝojn al la sieĝantoj. Subite estis serio da teruraj kriegoj, kaj la infanoj

devis rapide reeniri la urbon, kriegante dum la forkuro.

Post mallonga tempo ili revenis kune kun plifortigajo de malgrandaj infanoj, kiuj estis armitaj per bastonoj kaj ŝtonoj.

Ili denove incitegis la vespejon kaj la vespoj, nun fariĝintaj tute koleregaj, elflugis simile al nubo. Tiuj knaboj, kiuj ne estis jam rekompencitaj pro sia klopodo, preterpasis mallongan interŝpacon kaj atakis la vespejon per ŝtonoj. Kelkaj infanoj frotadis la brakojn kaj vizaĝojn, sed ĉiuj, senecepte, kriegis tiel laŭte kiel permesas la pulmoj.

Estis neniel senkuraĝa roto kiu uzike revenis en la urbon. Malgraŭ la fakto, ke iliaj vizaĝoj estis ŝvelitaj ĝis la patrinoj povis apenaŭ rekoni siajn proprajn idojn, la malgranda armeo preterpasis la stratojn promesante plenan venĝon je la vespoj la sekvantan matenon.

Eĉ Bruco mem povus juste fieriĝi de siaj posteuloj, pro la maniero je kiu ili estis lernintaj lian lecionon pri persisto.

## ESPERANTO.

In the first number of a new volume it may be advisable, for the benefit of those hitherto unacquainted with Esperanto and its ends, to give a brief description of the Second Language for All Nations.

Esperanto in no way aims at displacing any existing national language, but merely seeks to exist side by side with all as a friend in need. The selection of any national language to fulfil this important rôle would, obviously, be impossible, without bestowing great advantage on the nation whose national tongue was thus selected. Hence the need for some neutral medium, as simple as possible. Yet, in addition to simplicity, the Help-Language must be capable of fulfilling all the requirements of the far-reaching needs of modern life. And it is in this direction that the Esperanto star is especially brilliant, for it has been proved by thousands, all the world over, to be admirably adapted for commercial and friendly correspondence, literary work, poetry, and even for scientific research, as well as being particularly valuable for the spoken social and commercial intercourse of nations. This last peculiarity is, in the main, the result of two simple facts: the language uses but the five main continental vowels, A, E, I, O, U (Pa may we go too), which least lend themselves to confusion, and, secondly, the tonic accent of every word falls on the last syllable but one. As only such sounds have been incorporated as are easily rendered by all prominent nations, the happy result is that, no matter to what nationality your interlocutor may belong, his Esperantic address of welcome will be perfectly intelligible to you, and, indeed, you will have difficulty, as often as not, in detecting any "foreign" accent. These advantages, united with the fact that Esperanto is the national language of none, and that all can therefore use it without fear of making themselves ridiculous, are sufficient to give the Second Language for All Nations a just claim to its somewhat grandiose title. Moreover, the remarkable spirit of freemasonry which at present unites the world's fellow-students adds such a striking and unique charm to the study of the language, that those who have the public spirit to be in the van of a movement more beneficial to mankind than ninety per cent. of so-called philanthropic concerns, rejoice to find that they have chanced upon the most delightful of pastimes.

The system underlying the structure of Esperanto is so scientifically reduced to a minimum that it were even possible to set it forth within the slender limits of this single page, but we will leave the reader to gain his knowledge direct from the able text-books which already exist in

almost every European language, from Finnish to *Bulgar*.<sup>1</sup>

It is rather our purpose to introduce some inducements to the study of this remarkable language. We say remarkable, because, no matter who the student—be he Russian, be he Spaniard—the language fully satisfies him as to its syntax, vocabulary, and uniformity. This fact alone assures Esperanto of the great future which its present state leads the investigator to expect.

But, to return to our main purpose: "Why should our reader join our ranks?" It were well to first inquire what especial pursuits be his. If a scientist, then he must find his world woefully hemmed in by the almost impassable barriers of Babel. Owing to the fact that, year by year, more and more invaluable works are appearing in, say, the to-us-almost-unlearnable Russian, he may be spending precious years on a theory which has long been exploded in the literature of that vast, but little known, land. Yet, had our friend become an Esperantist, and a subscriber to the invaluable *Scienca Revuo*, he would have saved his time.

But, should our reader not soar so high as science, let him become a regular correspondent with some charming foreign fellow-student, or let him subscribe to some of the many *International Gazettes*, and he will find his ideas wonderfully broadened by the more exhaustive view he will be able to form of the world in general. Even such apparent trifles as picture postcards, postage stamps, and the like are vastly instructive, and many a volume of enthralling interest might be written about an Esperantist's postcard album.

But it is to the pocket, alas! that all things must appeal before they can truly achieve success. Let our business man of the Twentieth Century but realise that an international language brings an international market, and he will at once become an Esperantist, and reap the benefit. There is no particle of doubt that a commercial traveller knowing Esperanto possesses many advantages over his competitors.

The writer hopes that these few remarks may serve as an introduction to Esperanto for many future fellow-students. In conclusion, he must candidly confess that, during the two years he has interested himself (somewhat excessively it may be) in the matter, he has had the pleasure of corresponding with thousands of persons, from China to Peru, and of visiting hundreds abroad. He has derived an almost incredible amount of pleasure and information from the one fact that he is, what all should soon be, an *Esperantist*.

<sup>1</sup> See Cover for list of principal works.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs); 1½ roubles; 75 cents.

Wholesale agent: H. Ester Trompé, London, W.C.

All Communications should be sent to THE EDITOR, 47, Kensington Gardens Square, London, W.

## CONTENTS.

|   | Page. |
|---|-------|
| HENRY J. H. KOSTER'S EXPERIENCES<br>(A. J. Irvine)                    | 13    |
| BARBAROZA, French of Trophatolantia<br>(Esperanto of D. A. Ross M.A.) | 19    |
| MORTO DE MORO   | 19    |
| TYRUS, (continued from p. 11 (H.W.))                                  | 29    |
| THE CAT'S NEST (Dr. G. Legge)   | 27    |
| WILLIAM HAZARD THE MIMICRY, (con-<br>tinued from p. 13 (J. Kilmor)    | 24    |
| A VISIT TO THE LINGVISTIC SOCIETY (H.T.)                              | 26    |
| FAUNA (Original Poem by Thomas<br>Baker)                              | 27    |
| THE LANGUAGE OF THE FINEST YEARS<br>(J. H. Marchant)                  | 18    |
| BARTHOLOMEW, Poem by Richard Mel-<br>ville M.A. (Morr)                | 28    |
| UNUSUS VIVUS  | 31    |
| THE ANATOMY OF ROMANCE (J. F. Hanson)                                 | 31    |
| THE LANGUAGE OF MATHEMATICS (Dr. H.<br>Langens)                       | 32    |

For Local Information apply to the Hon. Secs.  
of the following Official Societies—

|   |
|---|
| Amsterd.—Dr. E. J. HART, 177 Toren, Oudekerk <sup>Amst.</sup>                       |
| Berlin.—Dr. F. W. SCHUBERT, 101 Unter den Eichen <sup>Berlin</sup>                  |
| Bombay.—Dr. A. B. LEECH, 11 Upper Colaba, Colaba <sup>Bombay</sup>                  |
| Boston.—Dr. A. G. HENRY, 7, Beacon Street <sup>Boston</sup>                         |
| Brussels.—Dr. W. DE WILDE, 18, Upper Watling Street, 1894 <sup>Brussels</sup>       |
| Calcutta.—Dr. E. W. LITTLE, 41, Upper Colaba, Colaba <sup>Calcutta</sup>            |
| Chennai.—Dr. W. G. GIBSON, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Chennai</sup>              |
| Copenhagen.—Dr. J. HENRIKSEN, 8, Nørrebro <sup>Copenhagen</sup>                     |
| Geneva.—Dr. G. G. H. DAVIES, 107, Rue de la Gare <sup>Geneva</sup>                  |
| Helsingfors.—Dr. G. H. WILSON, 2, Pöytäkatu, Helsinki <sup>Helsingfors</sup>        |
| Holland.—Dr. J. H. TAYLOR, 8, De Wijk, The Hague <sup>Holland</sup>                 |
| London.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>London</sup>                 |
| Lyons.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Lyons</sup>                   |
| Moscow.—Dr. A. B. LEECH, 11, Upper Colaba, Colaba <sup>Moscow</sup>                 |
| Paris.—Dr. G. G. H. DAVIES, 107, Rue de la Gare <sup>Paris</sup>                    |
| Prague.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Prague</sup>                 |
| Rangoon.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Rangoon</sup>               |
| St. Petersburg.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>St. Petersburg</sup> |
| Tientsin.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Tientsin</sup>             |
| Vienna.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Vienna</sup>                 |
| Zurich.—Dr. W. G. HENRY, 10, Upper Colaba, Colaba <sup>Zurich</sup>                 |

## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!

THE INTERNATIONAL MACHINE.

Coloured by use of automatics:  
The common sense of writers of all civilized peoples.

The Remingtons are the standard means for  
CORRESPONDENCE.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Broadway, N. Y., U.S.A.

## La Remington

LA UNIVERZALA SKRIBMASINO.

Ŝtudemas ĝin!

LA INTERNACIA MAŜINO.

Tiuj skribiloj de munda famo  
La komuna senculo por ĉiuj civilizitaj popoloj.

La Remingtonoj estas la norma maniero  
por korespondado.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Broadway, N. Y., U.S.A.

## A CIRJ. NI POVOS FAHADIZON IRL.

|                 |                 |
|-----------------|-----------------|
| The name of the | The name of the |
| The name of the | The name of the |
| The name of the | The name of the |
| The name of the | The name of the |
| The name of the | The name of the |

For Sale, 100, Broadway, New York, U.S.A. or  
100, Broadway, New York, U.S.A. or  
100, Broadway, New York, U.S.A.

## The "Review of Reviews"

Is the Best Magazine for Every Country.  
And it is read by "Everybody's" Scientists.

The aim of this Magazine is to make and keep throughout of  
the most widely and universally acceptable as a Talking Book.  
The interest and interest in the Magazine has been shown  
with intelligent interest the great number of "Review of Reviews"  
1900-7.

Post Free for Twelve Months, 5/6.  
10, 11, 12, 13, 14, 15, 16, 17, 18, 19, 20, 21, 22, 23, 24, 25, 26, 27, 28, 29, 30, 31, 32, 33, 34, 35, 36, 37, 38, 39, 40, 41, 42, 43, 44, 45, 46, 47, 48, 49, 50, 51, 52, 53, 54, 55, 56, 57, 58, 59, 60, 61, 62, 63, 64, 65, 66, 67, 68, 69, 70, 71, 72, 73, 74, 75, 76, 77, 78, 79, 80, 81, 82, 83, 84, 85, 86, 87, 88, 89, 90, 91, 92, 93, 94, 95, 96, 97, 98, 99, 100.

EDWARD BOWEN & CO., LONDON

## Adresareto de Personoj kiuj dezirus Korespondadi.

- Mrs. O. L. BROWN, Agents for Dunlop, 423, Park Lane, London, W.1. (Dunlop's tires, etc.)
- Prof. F. A. MERRILL, Ash Hill, Stoke-on-Trent. (Dunlop's tires, etc.)
- Prof. M. MITCHELL, Acadia University, 65, Marjorie St., Cambridge, London, N. (Dunlop's tires, etc.)
- Mrs. ALBERT MURPHY, 3, St. John's Place, Geneva, Switzerland. (Dunlop's tires, etc.)
- Prof. A. H. MERRILL, 100, St. John's Place, Geneva, Switzerland. (Dunlop's tires, etc.)
- Mrs. W. W. FARRER, 37, Darnley Road, Ipswich, England. (Dunlop's tires, etc.)
- Prof. C. FARRER, 7, Buckingham Palace, London, England. (Dunlop's tires, etc.)
- Mrs. JAMES FARRER, 100, St. John's Place, Geneva, Switzerland. (Dunlop's tires, etc.)
- Mrs. A. FARRER, 12, The Pavilion, Bath. (Dunlop's tires, etc.)
- Mrs. FARRER, 100, St. John's Place, Geneva, Switzerland. (Dunlop's tires, etc.)

La Revue de la Revue, 100, Broadway, N. Y., U.S.A.

# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĜE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Myba, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

**N.B.**

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi lu abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

**N.B.**

16. [Vol. II., No. 2.]

FEBRUARO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.



“La Eniro de Henriko VII. en Shrewsbury super la korpo de la Urbestro.”

PENTRATA KAJ RAKONTATA DE ALFRED J. HULME.

Henriko Tudoro, tiatampe Grafo de Richmond (poste Reĝo Henriko VII. de Anglujo) estis en jaro 1485 vojaĝanta tra Kimrujo kaj Anglujo kune kun granda sekvantaro, sur la vojo al la batal-kampo de Bosworth Field, kie li venkis la tiaman reĝon, Riĉardon III.

Antaŭ la tur-fortigita pordego de Shrewsbury venis la Grafo Henriko—bela juna viro havante dudek jarojn—kun sia sekvantaro, kaj postulis permeson eniri.

Sed la urbanoj malpermesis al li la eniron, ekkriegante, ke ili ja nonian reĝon konas krom Riĉardo, kies fidelaj regatuloj ili estas, kaj kies sigelon ili uzadas. La Urbestro esprimis solenan kaj seriozan juron, ke la Grafo ne envenos urbon escepte trans lia korpo—signifante, ke li preferas la morton antaŭ ol li permesos al Henriko la eniron.

Henriko trankvile reiris, starigis tendetaron kaj, nokttempe, sendis tri sinjorojn por paroladi ĉe la pordego. La rezultato de tiu ĉi parolado estis, ke la urbanoj decidis, ke ili permesos al li la eniron, se li transpaŝos super la korpo de la (vivanta) urbestro, dum tiu ĉi kuŝas sur la tero ekster la pordego, kaj per tio ne estos jurrompulo.

Tial, morgaŭe, tio efektiviĝis. Kun la belegeco kaj lukso, kiuj tiatempe akompanis militajn aferojn, la kavaliraro, rajdante antaŭ la militistaro, inter kiu estis Henriko, alvenis antaŭ la pordega fortikaĵo. La kradega barilo leviĝis. La urbestro, areto da urbanoj, kaj la urbestro—Tomaso Mitton—portante longan bluan robon, kaj liaj kunestroj kaj partianoj, sekvata ambaŭflanke de honor-gvardio de du vicoj da soldatoj, ĉiu tenante halebardon, elvenis ekster la pordego.

La kradego malleviĝis. Kvankam tiu ĉi okazis ekster la pordegoj, la ceremonio estis videbla el multaj hom-plenaj fenestroj de la ĉirkaŭ-urbaj domoj apud la pordego, kie devis logi ĉiuj neburgoj kaj alilanduloj.

Kiam liaj du lakeetoj metis sur tero matraseton kaj, genufleksinte, tenis la angulojn de la kapkuseno, la inda urbestro kiel eble plej majeste kuŝiĝis apogante sin sur kubuto, kaj serioze rigardis la junan Grafon Henrikon.

Doninte la kondukilon de sia gaje kaj blazone drapirata ĉevalo al paĝio, la Grafo, vestata de

(Block reproduced by kind permission of MESSRS. MEISENBACH & Co.).

brileganta blua ŝtala armaĵo, sed kun ortuka supervesto kaj velura ĉapo malsupreniris sur la (por bonveno flor-kovratan) teron kaj, inter kelkaj el liaj altrangaj kunuloj, promenis al la kuŝejo de Tomaso Mitton, kaj kun humila kaj bonsenta mieno suprepas la gravan kaj konsciencan Urbestron, kaj per tio savis lian valoran juron.

Tio farite, la kradego tuj leviĝis, procesio formiĝis kaj, sub pluveto de floroj—precipe ruĝaj, kiuj signitis la Lankastrian devenon kaj heredecon de la estonta reĝo,—la amaso sin turnis urban.

Henriko, rajdante sian belegan kremkoloran ĉevalon, iĝis la fokuso de granda bonvena aplaŭdado de la ĝoja popolo kiu salutis lin per krioj de: "Dio bone progresigu cin" kaj, por la unua fojo, liaj oreloj ricevis tiun ravan krimon: "Dio savu nian Reĝon."

Henriko gaste restis nur unu nokton en domo, kiu ankoraŭ staras.

Historio rakontas al ni, ke li tiam preteriris, kaj, unu semajno poste, sur la batalkampoj, li kroniĝis anstataŭ la ĵusmortinta Riĉardo III.

## BARCAROLLE.

De Théophile Gautier.

Dites, ma jeune belle,  
Où voulez-vous aller ?  
La voile ouvre son aile,  
La brise va souffler !

L'aviron est d'ivoire,  
Le pavillon de moire,  
Le gouvernail d'or fin ;  
J'ai pour l'est une orange,  
Pour voile une aile d'ange,  
Pour mousse un seraphin.

Dites, etc.

Est-ce dans la Baltique,  
Sur la mer Pacifique,  
Dans l'île de Java ?  
Ou bien dans la Norvège,  
Cueillir la fleur de neige,  
Ou la fleur d'Ansoka ?"

Dites, etc.

"Menez-moi," dit la belle,  
"A la rive fidèle,  
"Où l'on aime toujours."  
Cette rive, ma chère,  
On ne la connaît guère  
Au pays des amours.

Dites, etc.

## BARKAROLO.

Tradukita de D. S. Rose, M.A.

Diru, belulino !  
Kien iri vi volas,  
Liberiĝas la velo,  
La venteto blovas.

Elefantost' remiloj  
Kaj silkaj flagetoj,  
Ora direktilo ;  
Por balasto kaj vel'  
Orango, de angel'  
La bela fiugilo.

Diru, k.t.p.

Ĉu al la Baltiko,  
Aŭ la Pacifiko ?  
Diru, kara mia,  
Aŭ kie, de neĝo  
Reĝadas la reĝo  
En lando glacia ?

Diru, k.t.p.

"Foriri volas mi  
"Al la lando kun vi  
Kie amo restas."  
Ĉe amantoj, Ho ve !  
Tiu lando tute  
Nekonata estas !

Diru, k.t.p.

## MONATO POST MONATO.

—  
 “*Nun mi tuj instruos vin,  
 Kial ĉiu vorto, aŭ bruo, aŭ sono,  
 Pro ĝia ripetado,  
 Eĉ se ĝi nur blekiĝis de muso,  
 Devas alveni ĝis la Domo de la Famo.*”

Legante tiujn vortojn de la patro de la Angla poezio, ni nature memoras la historion de Esperanto. Ĉiuj nun scias kiel la unuaj vortoj, parolitaj en la Pola Varsovio, pli kaj pli disvastiĝadis, ĝis kiam ili fine atingis sian celon, la finoj de la mondo. Kaj ni hodiaŭ ĝoje ekvidas ke la son-ondetojn, ĉiam plilarĝigantaj, fine superfluis la tutan mondon, ĉar Esperanta Societo nun ekzistas en Nova Zelando. Feliĉa je la posedo de forta Komitato, tiu ĉi plej moderna el Societoj komencis viglan vivadon, flegata de la kolonia lerteco kaj energio, kiu ĉiam karakterizas la Novan Mondon.

Sur represaĵo de anonco sur la *Auckland Star* ni legas :—

Esperanto—kaj internacia frateco.—Vidu anoncon.

Esperanto—la afero de la dudeka jarcento.—Vidu anoncon.

Esperanto—perfektigas nian neperfektan lingvon.—Vidu anoncon.

Esperanto—de plezuriga utileco por ĉiuj.—Vidu anoncon.

Esperanto—kontaktigas kun huntempa Eŭropa pensado.—Vidu anoncon.

Esperanto—la Help-lingvo.—Vidu anoncon.

Ni citas tion ĉi kiel specimeno de koloniaj penadoj propagandi kiu, kiam aldonata al “Esperantaj naĝ-kursoj,” “Esperantaj ludoj,” k.t.p., estas dezirinda aldono al la ĝis nun uzataj metodoj.

Kiel la son-ondetojn nun, kiel ni ĵus vidis, atingis siajn limojn, ili nature kuntiriĝas, kaj, kiam alvenos la somero, ili devas esti kunĉentriĝintaj, ne ĉe Varsovio, sed ĉe Bulonjo, la bonvena haveno de la Esperantistoj.

La memorinda kunveno kredeble superos niajn atendojn. S<sup>ro</sup> Michaux, la nelacigebla, ĉiutage ricevadas promesojn ĉeesti, kaj multe da la vizitontoj intencas profiti pro la okazo, kaj viziti Londonon antaŭ, aŭ post, la kongreso. La dato de tiu ĉi definitive anonciĝis kiel Aŭgusto 3—13; la ĉefaj kunvenoj okazos je la 6a kaj 10a de la monato. Bileto por ĉiuj kunvenoj, festoj, kaj ceremonioj kostas nur tri frankojn, kaj tial neniel

## MONTH BY MONTH.

—  
 “*Now hennesforth I wol thee teche,  
 How every speche, or noise, or soun,  
 Through his multiplicacioun,  
 Thogh it were pyped of a mouse  
 Moot nede come to Fames House.*”

CHAUCER.

Reading those words of the “Father of English Poetry,” we naturally call to mind the history of Esperanto. All now know how the first words, spoken in the Polish Warsaw, have become more widely known, until they have finally reached their goal, the ends of the earth. And we to-day gladly note that the little waves of sound, ever widening, have at last covered all the earth, for an Esperanto Society now exists in New Zealand. Fortunate in the possession of a strong Committee, this most modern of Societies has commenced a vigorous existence, fostered by the Colonial smartness and energy which ever characterises the New World.

On a reprint of an advertisement in the *Auckland Star* we read :—

Esperanto—and International Fraternalism.—See Advert.

Esperanto—the vogue of the 20th Century.—See Advert.

Esperanto—makes perfect our imperfect speech.—See Advert.

Esperanto—of pleasurable usefulness to all.—See Advert.

Esperanto—effects contact with present-day European thought.—See Advert.

Esperanto—the Key Language.—See Advert.

We quote this as a specimen of Colonial efforts at propaganda, which, when added to “Esperanto swimming races,” “Esperanto games,” etc., form a desirable addition to the hitherto adopted methods.

As the waves of sound have now, as we have just seen, reached their limit, they naturally tend to contract, and, when summer comes, they should have become concentrated once more, not at Warsaw, but at Boulogne, the welcome haven of the Esperantists.

The memorable gathering bids fair to eclipse our expectations. Maitre Michaux, the indefatigable, daily receives promises to be present, and many of the visitors intend to profit by the opportunity, and visit London before or after the Congress. The date of the latter has been definitely fixed for August 3th—13th; the principal meetings will take place on the 6th and 10th of the month. Tickets of admission to all meetings, festivities, and

povos malhelpi la ĉeestadon de kiel eble plej multe da samideanoj. Estas esperinde, ke ni en Londono povos aranĝi diversajn socialajn kunvenojn por kontentigi niajn alilandajn vizitontojn.

Tiaj okazoj kiaj la Jarkunveno de la London Esperanto Club, kiu okazis Jan. 12 ĉe la Essex Hall, donas grandan helpon al la Afero. Je la nomita okazo multaj afablaj helpantoj faris kantojn, recitadojn, kaj dramajn skizojn en Esperanto, kaj multaj favoraj kritikaĵoj aperis sur la Brita gazetaro la sekvantan tagon.

Ĝus antaŭ tiu bone ĉeestata kunveno la gazeto de la B.E.A. unue aperis, sub alloganta verda kovrilo. Ĝi devos trafi sian celon, nome, unuigi la diversajn grupojn kaj helpi la ĝeneralan Britan propagandon. Ni rapidas sendi niajn plej korajn bondezirojn pro la sukceso de la nova ĵurnalo. Ĝia enhavo estas proksimume la duono de tiu de THE ESPERANTIST, kaj la jarabonpago estas proporcie.

Iom simila je formo kaj apero estas la nova kaj beleta *Germana Esperantisto*, kiu estas inda je niaj Germanikaj amikoj, kaj kiu sekve havos kreskantan disvastiĝon.

La nova Rusa Monataĵo estas baldaŭ atendata, kaj ankaŭ devos esti valora aldono al niaj jam grava Biblioteko. Ni plezure vidas ke la *Vestnik Znanja* (Scienca Revuo) nun eldonigas senpagan aldonon, enhavantan mallongan monatan lernolibron. Nia kunverkanto, S<sup>ro</sup> Kolowrat, antaŭ ne longe eldonis Rim-vortaron kaj beletan kanton, "*Kuraĝe antaŭen*," kiujn li sendos post ricevo de 70 c. poŝtmarke (Morskaja 29, Peterburg).

Turkujo ĝis nun restis iom malantaŭe, kaj estas kun speciala plezuro ke ni lernas pri la fondiĝo de Esperanta kurso en unu el la plej ĉefaj kolegioj, kie la studentoj mondrigas la kutiman entuziasmon oro la lingvo. Eble, se tiu ĉi fakto estis konita antaŭ kelkaj monatoj, Gergovio estus vizitinta Turkujon dum ŝia Esperanta vojaĝo!

Sed eble niaj legantoj ne konas pri ŝia ekzistado! Certe ni mem tre miris kiam ŝi alvenis ĉi tie dum la Kristnaskaj festoj, pasigi la gajan tempon en nebulega Londono. La nebulego estis ja tiel densa ke la poŝtisto ne havis facilan laboron meti ŝin ĉe ŝia celo. Ni supozas ke tiaj mond-vagantaj leteroj baldaŭ oftigos, ni do tie ĉi ekzamenos la historion de Gergovio de kiam ŝi lasis sian hejmon en *Clermont-Ferrand* lastan Julion.

Vizitinte Belgujon, Svedujon, Bohemujon, Rusujon, Germanujon, ŝi envenis Anglujon, nur rapide transsendiĝis Kanadujon, el kie al la

ceremonies cost only half-a-crown, and so can in no way check the visit of as many friends-in-Esperanto as possible. It is to be hoped that we in London will be able to devise some social gatherings to entertain our future foreign visitors.

Such functions as the Annual Meeting of the London Esperanto Club, which took place on January 12th at the Essex Hall, give great stimulus to the Cause. On the occasion in question many kind helpers rendered songs, recitations, and dramatic selections in Esperanto, and numerous favourable criticisms appeared in the British Press on the following day.

Just before that well-attended meeting the Gazette of the B.E.A. made its first appearance, under an attractive green cover. It should serve its purpose, namely, to unite the divers groups and assist general British propaganda. We hasten to send our best wishes for the success of this journal. Its contents amount to approximately half those of THE ESPERANTIST, and the subscription is likewise in proportion.

Somewhat similar in form and appearance is the new and pleasing *Germana Esperantisto*, which is worthy of our Teutonic friends, and which should, in consequence, have a steadily growing circulation.

The New Russian Monthly is expected shortly, and should also be a valuable addition to our already impressive Library. We are pleased to note that the *Vestnik Znanja* (Scientific Review) now issues a free Esperanto supplement, containing a short monthly text-book. Our contributor, Mr. Kolowrat, has also recently published a Rhyme-vocabulary and a pretty song, "*Kuraĝe antaŭen*," which he will send on receipt of six stamps (Morskaja 29, St. Petersburg).

Turkey has so far been rather in the background, and it is with especial pleasure that we learn of the foundation of an Esperanto course in one of the principal colleges, where the students show the usual enthusiasm for the language. Maybe, had this fact been known a few months back, Gergovio might have visited Turkey on her Esperanto journey.

But perhaps our readers are not aware of her existence. We certainly were most surprised when she put in an appearance at Christmastide, to spend the happy season in foggy London. Indeed the fog was so bad that the postman had no easy task to deposit her at her destination. We suppose that such world-encircling letters will soon become common, so we will here look into Gergovio's history since she left her home in *Clermont-Ferrand* last July.

After visiting Belgium, Sweden, Bohemia, Russia, Germany, she entered England, only to be promptly despatched to Canada, whence to the



Unuigitaj Ŝtatoj, Meksiko, Peruo, Hindujo, Maltujo, Italujo, Algerujo, kaj, fine, "Hejmo, dolĉa hejmo"! Ĉiu ricevinto aldonis kelkajn vortojn de bonveno, tial ke la dokumento ja estos kuriozaĵo, se ĝi postvivus la danĝerojn de la vojaĝo ĉirkaŭ la mondo.

Neordinara nombro de artikoloj aperis dum la lasta monato pri Esperanto, kaj ni interese ekscias ke la Amerika *New Era* ekhelpis nin, sur la alia bordo de la hareng-lagego.

Kontraŭe, novaj libroj ne estis multenombraj. Libreto laŭ la *Penca Lernolibro* eldoniĝis de la firmo Hachette en la Franca lingvo, kaj la firmo Borel eldonis alian broŝuron kaj libreton pri *Kurbaj Linioj* (23 pp.; 70 c.).

Kvankam "La Ventego" estis presita antaŭ la Nova Jaro, ni nur ricevis ilin de la bindistoj malmultope. Ni kontente anoncas ke ĉiuj fruaj aĉetantoj nun proviziĝis, kaj ke granda nombro de aprobantaj leteroj jam alvenis de niaj amikoj.

Ĉar ŝajnis esti bezono por ia bone aranĝita libreto por donaci, kie la kutima paperdorsa broŝuro ne estus akceptinda, ni nun eldonigas "The Esperanto Language Practically Considered and Described," de nia bonekonata amiko kaj eminenta filologo, D<sup>ro</sup> Lloyd, de Liverpool. Sub bela art-tuka kovrilo (kun portreto), tiu ĉi libreto nun estas aĉetebla je 1 fr. 20, aŭ 10 frankoj la dekon.

Ni fidus ke ĝi same ricevos la aprobon de niaj legantoj, kaj gajnos novajn samideanojn el la rangoj de la lingvistoj kaj kleruloj al kiuj ĝi celas alvoki.

Konkludante, ni deziras danki ĉiujn Korespondantojn kiuj afable sendis Kristnaskajn kaj Nov-Jarajn kartojn.

LA REDAKTORO.

Post kiam ni sendis ĉiujn artikolojn por tiu ĉi numero de THE ESPERANTIST, alvenis la sekvanta letero, kiun afable sendis al ni D<sup>ro</sup> Carlo Bourlet, el Parizo.

"KARA SINJORO,—Mi estas vokita al la milito, kaj mi devas forveturi Mandjuruĵon. Ĉar mi estas neĵuna kaj malsana, tial mi esperas, ke oni baldaŭ min liberigos kaj mi povos denove labori por nia afero kaj partopreni en la Kongreso.

"Sed, en ĉia okazo mi, en la daŭro de kelka tempo, ne povos labori. Tial mi petas ke miaj amikoj ne miru, ke iliaj leteroj al mi, kelkan tempon (eble eĉ longe), restos sen respondo.—Via, L. ZAMENHOF.

Kompreneble ĉiuj Esperantistoj sendas siajn bondezirojn al nia eminenta Estro, kaj esperas ke lia vojaĝo ne estos tre longa, kaj ke li povos ĉeesti Bulonje.

Profesie, D<sup>ro</sup> Zamenhof estas okulisto kaj, eble, ne estos tro fari por li ĉe la militejo. Ni laboradu por ke la lingvo restu sur pli forta fundamento antaŭ ol nia Estro revenos kunlaboradi.

Nur unu semajno antaŭ ol li skribis tiun malfeliĉan sciigon, ni ricevis unu el liaj atablaj komunikaĵoj pri *La Ventego* :—

"KARA SINJORO,—Kun vera plezuro mi ricevis la ekzempleron de la tre bele eldonata 'Ventego,' kaj mi dankas Vin kore por Via donaco. Volu akcepti mian plej sinceran novjaran bondeziron por Vi persone, kaj por Via gazeto."

Vere, la gravaj okazoj de la vivo venas subitege.

P.S.—*La milita malsanulejo trovas, ke nia Estro ne estas sufiĉe forta por la milito. La certa oficiala decido venos nur post kelkaj tagoj.*

United States, Mexico, Peru, India, Malta, Italy, Algiers, and, finally, "Home, sweet home." Each recipient added a few words of welcome, so that the document will indeed be a curiosity, if it survives the perils of the journey round the world.

An exceptional number of articles on Esperanto have appeared during the last month, and we note with interest that the American *New Era* has lent a hand on the other side of the herring-pond.

On the contrary, new books have not been plentiful. An adaptation of the *Penny Text-book* has been published by Messrs. Hachette in French, and Messrs. Borel have published another brochure and a little work on "Curved Lines" (23 pp.; 7d.).

Although "La Ventego" was printed by the New Year, we only received them from the binders a few at a time. We are glad to say that now all early purchasers have been supplied, and that a great number of approving letters have been already received from our friends.

As there seemed to be a need for some nicely got-up booklet, suitable for presentation, where the usual paper-back brochures would not be acceptable, we now publish "The Esperanto Language Practically Considered and Described," by our well-known friend and eminent philologist, Dr. Lloyd, of Liverpool. In neat cloth cover (with portrait), this book can now be obtained at 10d. a copy, or 9s. the dozen.

We trust that it will likewise receive the approval of our readers, and will serve to gain fresh adherents from the ranks of the linguists and scholars to whom it is intended to appeal.

In conclusion, we desire to thank all correspondents who kindly sent Christmas and New Year cards.

THE EDITOR.

## VIVIENO.

Duparta Ferakonto de E.W.

[Parto II.].—La korteganoj tre ekscitigis; ĉiuj la kavaliroj de la Ronda Tablo invitigis por partopreni je la memorinda okazo. Oni ĉie kaj ĉiam parolis pri gravaj solenaj gloraj vidaĵoj, dancoj, ludoj, kursoj, pri bravec-provoj kaj batal-lerteco inter fortaj herooj, pri kunkurenco inter belulinoj rilate al juveloj, vestoj kaj antaŭeco. Tiel okazis ke tute sen rimarko aperis en la kortego orfulino, zorgatulino de la princo. Estis nia Vivieno, iom plibeliginta je formo kaj moroj, de la tempo kiam ŝi, plorante forprenigis de la hejmo de ŝia infaneco. La klaraj blujaj okuloj nun havis marverdan nuancon, kaj ombrigis per longaj okulharoj preskaŭ nigraj. Ŝiaj iam blondaj, libere defalantaj haroj nun alformis kvazaŭ duoblan nigra-ruĝan kronon ĉirkaŭ ŝia malgranda kapo. Ŝia voĉo estis klara kaj dolĉa, sed estis malpli sincera, malpli korega. Efektive la novaj longaj roboj embarasis ŝin. Baldaŭ kelkaj nejunaj kavaliroj, altiritaj per ŝia modesta silento, atente rigardis ŝin, kaj eltrovis, ke ŝi havis trajtojn kaj vizaĝkoloron pli delikatajn ol tiuj de la plej adoritaj belulinoj de la kortego. Kompreneble ili esprimis al ŝi sian admiron, egale kompreneble ŝi plezure aŭdis kaj ridetis.

De tiu tempo ĉiuj kavaliroj amindumis ŝin, kaj kredis reciprokan la senton.

Tamen Vivieno ne estis feliĉa; kaj ŝi eĉ deziris morti, tiel akraj estis la ĵaluzoj de la antaŭe adoritaj belulinoj.

Unu tagon la mondfama profeto Merlin vizitis la reĝon, kaj havis solenan akcepton. Ĉiuj vidis en li la plej grandan konsilanton kaj defendanton de la nacio. Vivieno vidis nur viron malgrandan, havantan perfektajn trajtojn, fergrizajn harojn, longan barbon, okulojn dubelumajn kaj abstraktan vizaĝesprimon. Ŝi atendis ian mienon adorindan, formon suprehoman pro gracia majesteco. Tamen, post malmultaj tagoj, ŝi ne povis plu ĝui la spritemajn parolojn de la ĉirkaŭstarantoj, sed nur volis aŭdi unu voĉon, esti sola por ĝin aŭskulti.

Unu vesperon subite ekrigardanta, ŝi vidis la okulojn de Merlin fiksatajn sur ŝi kun esprimo de akra serĉado. Kviete ŝi toleris lian rigardegon kaj volonte ŝi redonis rigardon plenan je la plej gentila, respektiga amo. Post tiu tago ili estis ĝeamikoj. Rajdante, promenante aŭ ĉe la reĝaj salonoj, li estis ĉiam apud ŝi, kaj malicaj enviemaj korteganoj korege ridis vidi la profeton ensorĉitan de "senkora koketulino." Ilia mokado ĉagrenis nek la profeton, nek Vivienon. Ĉiutage ŝi fariĝis pli feliĉa, ŝi povis ĉion ami en tero kaj ĉielo, mem la malsaĝojn kaj malbonojn. Ŝi amegis sian

belegan landon kaj—senlima feliĉeco kaj eterna—ŝi tiom amis Merlin, ke ŝi neniam pensis al la amo de Merlin; neniam ŝi demandis: Ĉu mi estas amata de li?

[Parto III.].—Denove estas grandega ekscitego en la kortego de Princo Arthur, ne plu pro reĝaj vizitantoj kaj publika gajeco, sed pro teruraj danĝeroj kaj pro la rimedoj por savi la liberecon al la lando, la honoron al la batalantoj, kaj la vivon al la popolo. La barbaroj, senfidaj Sisnaĥoj, idolanoj, homoj senhejmaj, senteraj, neamataj de siaj kunloĝantoj, nomaduloj: tiuj ĉi, per glavo kaj glaveto, fajro kaj perfido, penadas venki aliajn landojn. Ofte venkitaj, ofte forpeltitaj, ili ĉiam pli multnombre revenadis kaj malrapide estis akirantaj la tutan insulon. La kavaliroj de la Ronda Tablo kaj siaj samlandanoj heroe bataladis, sed la glora malmulto devas necese cedi al la multoj, kiuj ne devis zorgi pri virinoj kaj infanoj. Nun la fino proksimiĝis. Jam sendis Arthur kaj Merlin tempo post tempo en transmarajn landojn tiom da ne batalantoj kiom la ŝipoj povis enhavi. Nun oni bezonis savi ĉiujn, kiuj restis en danĝero ĝis la reveno de la ŝipoj.

La profeto havis multajn amikojn inter la Feoj, li sciis kie trovi grandajn subterajn kavernojn, kie senĉese fluas puraj riveretoj, kaj en kies proksimeco kreskas fruktoj, grenoj kaj radikoj. La ĉeestado de tiom da homoj ja nekonvenis al la feoj, sed la feoj, kaj precipe la feinoj, estas treege patramaj. Ili neniam deziras forlasi sian landon, ili avidas nek oron nek arĝenton; en siaj spertaj magiaj manoj la arbaroj fariĝas multe pli belaj ol smeraldoj, pli multekostaj ol rubenoj. Ili honoris kaj amegis la venkitajn defendantojn de la Kimrujo. Sed la feoj sciis ke inter tiuj estis perfiduloj, pagitaj de la Sisnaĥoj. Tial ili devigis Merlin ĵuri solene neniam diri la sekretojn de la kavernoj krom al unu sola estaĵo; kun ilia konsento, ili konfidis ĝin al la duonfeino Vivieno.

Nun ŝi estis plene okupata, tage rajdante, sekvita de juna ĉevalisto, al malproksimaj vilaĝetoj por instrui la loĝantojn ĉion, kion ili devos fari, nome sin pretigi por rapida forkuro; ĉiam observi la supron de la monteto de Merlin, kaj tie vidinte lumturfajro, tuj marŝi tien kun ĉiuj porteblaĵoj. Nokte ŝi helpis malsanulinojn, konsolis malfeliĉulinojn, kaj kuraĝigis timulojn.

Fine alvenis la fatala tago. Matene marŝis la Princo kun la pluparto de la kavaliroj por kontraŭbatali la Sisnaĥojn el la oriento, morgaŭe marŝos la aliaj, sub Merlin, kontraŭ alia bandego, el la nordo. Vivieno ricevis la lastajn ordonojn

de la profeto, kun lia beno. Ŝi diris al li adiaŭ kaj iris returnen al la palaco. Lacega, ŝi sin kuŝis; apenaŭ dorminte, ŝi ekvekigis pro brilega lumo, kiu montris al ŝi tri feinojn. Unu diris: "Venu tuj kun ni, aŭ Merlin mortos!" Sen prokrasto, sen dubo, ŝi eksaltis, jetis sur sin nigran mantelon kaj silente akompanis ilin. Voje, ŝi sciigis, ke bando da armataj viroj jam ĉirkaŭis la monteton en kiu li estas ĉe la lumturo kaj, ne kuraginte supreniri en lokon ensorĉitan, ili atendas lian malsupreniron. Nenia feo povis averti ilin, ĉar la monteto fermigis kontraŭ ĉiuj nehomaj estaĵoj krom la ĉielaj anĝeloj; sed la Kristana bapto de Vivieno ŝin ebligis eniri mem en la lokon plej sekretan. Ŝi sola povas savi la vivon tiel necesegan al la tuta nacio; ŝi perdos eble sian propran vivon, tamen ŝi savos sian popolon.

Vivieno konsentis. Ŝi ricevis de la feinoj du teksaĵojn tiel delikataj kiel araneaĵo, kaj aŭdis ilian instruon. Ŝi devos trovi Merlin en malgranda observatorio apud la lumturo, sciigi al li la venontan atakon, lin decidigi sin kaŝi en proksima nevidebla kaverno kaj ĵuri solene, ke li tie restos ĝis la reveno de la Princo. Se li tute ne volus tiel lasi sian oficon, Vivieno devos ĵeti sur lian vizaĝon la bluan teksaĵon, kiu lin tuj dormigos, je dormado kiu daŭros dum centjaroj, se li ne vekigis per ĉarmo pli potenca. Pro tio la teksaĵo ruĝa! Ĉiuj el la feinoj ripetis: "Vualo blua por dormigi, vualo ruĝa por vekigi!" kaj subite malaperis.

Sola kaj laca, Vivieno alvenis al la monteto. Ŝi vidis la armatajn gardantojn kaj diris, "Mi alportas depeŝon al la Estro." Ili ŝin permesis

trapasi. Por ke neniu povu sekvi ŝiajn piedsignojn ŝi lasis la vojeton kaj baraktis tra dornoj kaj arbetoj ĝis ŝi alvenis kun manoj kaj piedoj kontuzaj kaj sangaj al la observatorio. Merlin dormis. Aŭdinte ŝian voĉon, li eksaltis kaj, aŭdinte ŝian tutan rakonton respondis: "Adiaŭ, iru en la kaverton, tie restu ĝis mi estos kondukinta al la batalon la virojn armatajn, kaj poste reiri en la palacon." "Pro amo de la nacio, cin savu, mia patro, ci estas la sola espero de nia patrujo."

Decide li diris, "Vi vin trompas, filino mia, neniu estas iam necesega, kiam venos la horo Dio sendas la viron. Adiaŭ!" Tiam sciigis Vivieno ke la virta saĝulo neniam cedos. Ekĝemante, ŝi preĝis: "Pardonu al mi, patro mia, ke mi cin tentis. Donu al mi unu solan kison, ĉar eble ni nin neniam revidos." Malrapide, ŝanceliĝe, liaj lipoj tuŝas ŝian frunton; vibro de feliĉeco fortigis ŝiajn brakojn. Subite al li ĉirkaŭpreninte la kolon, ŝi jetis de poste la bluan vualon super lia kapo, kaj lin helpis atingi seĝon. Konfuza, ŝi staris rigardanta la belegan vizaĝon dormantan. Subite brila lumo blindigis ŝin, triumfaj krioj surdigis ŝin, la tero tremis kaj fendigis, vento el profundejo ŝin ekkaptis, turnigadis kaj sensentan alĵetis sur la teron.

Morgaŭe Vivieno kondukis palajn forkurantojn al la kavernoj. Vespere, ellacigita, ŝi dormadis.

Dum multaj centjaroj la sklavigaj Kimroj komfortigis pro la kredo ke Merlin revivos por ilia reliberigo.

Kia estis la sorto de Vivieno? Neniu scias, estas ne grave! Ŝi ja estas nekompatinda, ĉar ŝi ĝuis grandegan feliĉecon.

## LA KAT-NESTO.

Observata kaj rakontata de Dr<sup>o</sup> Richard Legge.

Legante la interesan rakonton en via Decembra numero pri "Instinkto aŭ Inteligenteco" mi pensis, ke la sekvanta vera okazo estus rakontinda.

Antaŭ ne longe mi havis katinon, kiu estis loĝadinta ĉe mi dum pli ol du jaroj. Jen ŝi estis aminda, jen ŝi montris signojn de esti nur duone malsovaĝigita. Unufoje ŝi foriris el la domo kaj estadis ekstere dum du aŭ tri monatoj. Ofte ŝi alvenis al la pordo, sed nek ŝi envenus nek akceptus iajn mangaĵojn. Fine, ŝi revenis kaj redaŭrigis siajn antaŭajn kutimojn amindajn.

Je Septembro de tiu ĉi jaro oni ekvidis ke ŝi atendadis sian akuŝon: ŝi travagis la domon kaj serĉis lokon konvenan por tiu ĉi okazo, multfoje arinta litan en komodo en la dormoĉambro. Oni

ne permesis tion kaj forpelis ŝin kaj fermadis la pordon de la dormoĉambro. Poste, dum multe da tagoj, ŝi eliris ĉiutage kaj revenis al la domo nur por mangi. Tago post tago oni penadis trovi kien ŝi iris, sed sensukcese. Oni ŝin vidis kuraĝe ĉirkaŭ tricent futojn tra la kampo, kaj tiam ŝi malaperis. Fine, unufoje, mia kolego, Dr. N—, ŝin vidis suprenrampantan la trunkon de kratagarbo kaj enirantan la neston neuzitan de pigo de la antaŭa jaro. Dr. N— suprensekvis ŝin kaj trovis en la nesto kvar belajn katidojn kun ilia patrino. La nesto estas pli ol dudek futojn supre la tero.

Tiu ĉi katino mem loĝis kaj elnutris antaŭan aron da idoj en la hundejo kun mia hundino.

Mi ne estas aŭdinta antaŭe pri katidoj, kiuj estas naskigintaj en arbo.

## KIAM EKFLORADAS REZEDOJ.

A  
Pentraĵeto el Rusa Litvujo.

Originale en Esperanto, verkita de Osip Ivanoviĉ Elleder.

Mi memoras la unuan renkonton de Leonid Leonidoviĉ kun la freneza knabino. Tio estis en printempo post lia alveno. Li venis en nian Litvan angulon en malfrua aŭtuno en monato Novembro. Neĝojn ni havis tiam ankoraŭ ne multajn sed la frostoj estis jam severaj, tial la frenezulino estis jam antaŭ kelkaj semajnoj forkondukita de sia sidejo. Mi konatigis najbarmaniere kun Leonid Leonidoviĉ kaj ni ofte iris kune promenadi aŭ ĉasadi. Mi estas granda admiranto de la naturo kaj Leonid Leonidoviĉ konis tiel bone ĉiujn naturaperaĵojn, kaj kvankam li ne volonte paroladis, tamen ĉio, kion li rakontadis, estis ĉiam interesinda; mi tial plezure akompanadis lin. Tiamaniere ni konatigis kaj kunamikigis.

Pasis la vintro, venis printempo, alflugis birdaroj. Ĉiuvespere el la proksima arbaro eksonadis nun laŭtaj melodias fajfadoj de turdoj kaj merloj kaj apud ĉia marĉeto vagadis ruĝtibiaj cikonioj. Unu tagon en Aprilo estis venta, malgrabila vetero, sed post mezatago, je la kvara horo, la vento tute kvietigis, fariĝis pli varme kaj mi foriris por fari la promenadon tra la arbeto, kies fondo nun estis kovrita per amasoj de ĉielbluaj hepaticoj kaj blankaj anemonoj, parte origita per steletoj de flavaj gageoj (*gagea lutea*) aŭ sur malseketaĵoj per larĝfoliaj ĥrisosplenioj (*Chrysosplenium alternifolium*).—Admirante tiun ĉi tapiŝon de raviganta ĉarmeco, kun kiu nevideblaj spiritoj por festo fianĉa nun ornamigis la teron, mi tie renkontis Leonid Leonidoviĉ, kaj ni kune longe promenadis aŭskultante la voĉojn de reviviginta naturo aŭdataj ĉie: el la tero, el akvoj, en la aero, de ĉiuj sennombraj folioburĝonoj. Ĉie oni sentis la spiron de juna mistera vivo. Ĉio tio videble bonfarante efikis je la spirita stato de mia akompananto, li fariĝis pli parolema kaj la malĝoja trajto, kiun oni ĉiam en lia vizaĝo vidis, estis nun malpli rimarkema ol kutime.

La luno jam klare lumis kiam ni venis al la bordo de Ŝeŝupo, jen subite eksonis de ne tre malproksime, kvazaŭ el nuboj ĉielaj elirante, la kantado de la frenezulino.

Kiel arĝentaj voĉoj de harpo eksonoris tra la silenta nokto la kanto portata de kvietaj printempaj aerondoj—jen proksimiĝante, jen ree malaperante, nun laŭte, ĝis fine, malrapide iom post iom disfluigante en la trankvila malproksimeco

ĝi ekmortigis. Ŝi kantis kanton pri malfeliĉaj geamantoj kaj sendireblan sopiron kaj maldolĉegan plendon de juna knabino, kies amatulo estas deviginta restadi malproksime kaj nur per “*marga gromateli*” (multkolora letereto) povas konsoligisian knabinon, esprimis la strofo ĵus eksonanta:

. . . *kass man' ij vardalo, ir ij prarardelo  
nier' mano jaŭnialo, balto dobile-e-lo,  
ir alejtu ponu, ŝmtas milionu  
nier' mano jaŭnialo balto dobile-e-e.*<sup>1</sup>

Ni haltis kaj aŭskultis:

. . . balto dobile-e-e redonita de ĉio ŝajnis vibri kaj tremeti ĉie en la aero.

Leonid Leonidoviĉ demandeme ekrigardis min.

“Kio estas tio?” diris li post unuminuta silentado mallaŭte, kaj lia voĉo ŝajnis iom malcerta.

“Litva kanto,” rediris mi.

“Kaj la mistera kantistino?”

“Estas kompatinda frenezulino,” kaj mi rakontis al li kion mi sciis pri ŝi.

Li aŭskultis min tre atenteme kaj mi rimarkis kiel li dum mia rakonto kelkfoje nevole ekremetis.

Kiam mi finiĝis ekdemandis mi: “Ĉu vi volas vidi la frenezan knabinon? Ŝi sidas ne tre malproksime de ĉi tie sur la alta ŝtono apud la rivero.”

“Ne!” diris li rapide, “mi ne deziras vidi ŝin.”

Liaj vortoj sonis kontraŭ kutime malmole, ja preskaŭ malamike. Liaj vangoj estis iom ruĝiĝintaj kiam li diris: “Fariĝis jam tro malfrue, mi devas iri hejmen; bonan nokton!” kaj ne atendinte mian resaluton, kun rapidaj paŝoj li malproksimiĝis.

Pasis kelkaj semajnoj post la rakontita okazo. Leonid Leonidoviĉ mi nenie trovadis. Al kutimaj vesperpromenadoj li ne alvenadis, kaj mi, estinte tage tre okupata, ne povis elserĉi lin, tial mi nenion sciis pri lia farto. Unu dimanĉon mi fine decidis viziti lin sed alveninte en lian hejmon mi trovis domon fermitan kaj sensukcese mi devis reveni hejmen.

Tagoj post tagoj foriradis, jam de longe estis hirundoj revenintaj al siaj antaŭjaraj nestoj, en la arbaro kriadis kukoloj laŭte sian nomon, el la densaĵoj de Ŝeŝupa-bordo eksonadis dolĉaj kantoj de najtingaloj. Sur fondo de arbeto jam malaperis anemonoj kaj hepaticoj, aliaj kreskaĵoj anstataŭis ilin: pli altaj, pli luksaj levigadis ili

fiere siajn florkapetojn, malestime malsuprenrigardante je la modestaj, nun velkiĝantaj, infanetoj de frua printempo. De mia amiko mi nenion aŭdis.

Venis tagoj sunplenaj, la kukoloj jam ĉesis kriadi, en la grenkampoj ekfloris blujaj cejanoj, kaj kiel helaj flametoj lumiĝis inter la trunkaro ruĝaj floroj de kampakpavoj. De mallarĝaj kamplimetoj alportadis ventspiro odoron de timianoj kaj en mia ĝardeno ekflorantaj rezedoj dolĉigadis la aeron de vasta ĉirkaŭaĵo kun sia raviganta honodoro. . . . La norda somero kun sia varmeco, kun siaj ĉarmoj kaj turmentoj estis veninta.

Mi en tia tempo ofte forestadis de mia hejmo, ankaŭ mi havis multe por fari, tial mi ne posedis libertempon por aliaj aferoj. Mian homoevitantan amikon mi ne vidadis, kaj tial mi estis lin iom forgesinta.

\* \* \* \*

“ . . . Rezedoj miaj karegaj rezedoj kiom mi amas vin, ĉarmegaj, dolĉaj floretoj kiom vi estas karaj al mia koro, amataj, mi eksalutas vin; mi benas vin mil—milfoje!” Tiujn vortojn per de profunda pasio tremanta voĉo elparolitajn, aŭdis mi foje vespere kiam mi okaze eniris en la parton de mia ĝardeno, kiu estas pli malproksima de mia domo kaj kien ordinare en tia malfrua horo neniu venadis. Mi haltis kaj aŭskultis atente, la voĉo ŝajnis al mi konata. Kiu estas tie? demandis mi min mem ekmirigite. Jen ree mi aŭdis:

“Kresku, floru, odoru, vi estas ja ŝiaj favoruloj. Ho! se la vento povus forporti vian dolĉegan spiron kune kun miaj salutoj al ŝi, malproksimen, malproksimen,” jen la voĉo eksilentis, la parolanto devis esti min rimarkinta.

“Leonid Leonidoviĉ!” mi elvokis, kaj kun malmultaj grandaj paŝoj mi estis ĉe la barilo de ĝardeno.

Aliflanke, duone kaŝigite per elkreskitaj tie densaj siringoj, genue staris sur la herbaĵo mia amiko. Lia ĉapelo kuŝis apud li sur la tero, liaj brakoj estis etenditaj tra la paliseroj de barilo: kvazaŭ li volas ĉirkaŭpreni iun; li estis ankoraŭ pli pala ol kutime kaj tremis de ekscitiĝo.

“Leonid Leonidoviĉ! granda Dio kio estas al vi?” elvokis mi, “parolu, diru al mi kara amiko!” kaj kun granda salto super barilo mi estis apud li.

“Ho!” ekĝemis li, “pardonu, mi petegas . . . mi nenion . . . mi nur estis . . . mi volis . . .” konfuzie balbutis li, sin levigante kaj timeteme ĉirkaŭrigardante “mi nur admiris viajn florojn, ili estas tiel belaj . . . mi tre amas rezedojn,” aldonis li fine pli kurage.

“Nu mia kara amiko,” rapidis mi rediri por maskigi lian videblan konfuziĝon, “kiel mi ĝojas vin ree foje vidi, ni tiel longe ne kunvenis, kiel vi

fartas? Sed nun mi ne lasos vin, vi devas iri kune kun mi, ni hodiaŭ vespermanĝos kune kaj prenante lin sub la brako ni eniris en mian ĉambron. Alveninte tien li rakontis ke li lasttempe iomete malsaniĝis kaj pro tio ne povis daŭrigi nian interkomunikaĵon, ankaŭ ke li nun estas pli okupata ĉar li skribas artikolon en ia scienca ĵurnalo. Tiel kaj simile li penadis pravigi sian longan forestadon, sed mi ekkonis, ke ĉio dirita ne estis la vera kaŭzo, ĉar li seninterrompe balbutiĝis kaj ruĝiĝis. Li ne estis lerninta mensogi, mia kara Leonid Leonidoviĉ.

Iom post iom mia amiko retroviĝis, li fariĝis pli certa, kaj kiam li malfrue adiaŭdiris devis li promesi, ke li baldaŭ ree venos por ĝuadi la bonodoron de liaj amataj floroj.

De nun Leonid Leonidoviĉ ofte alvenadis, kaj forirante li ĉiam portadis freŝan rezedbukedon kun si.

De ia tempo komencis cirkuladi famoj: ke la frenezulino trovis nun kolegon. Kolonistoj kiujunkte kaptis fiŝojn en la Ŝeŝupo rimarkis, ke sube ĉe la granda ŝtono staras ia viro dum tutaj horoj se ne eĉ dum tutaj noktoj. Ankaŭ malfruigitaj terlaboristoj vidis ofte vespere Leonid Leonidoviĉ kiel li iris tra la kamparoj en direkto de la rivero, kaj oni supozis ke li, kaj la nokta gasto ĉe granda ŝtono estas sama persono.

Mi tion ne volis kredi, sed, foje ĉasante, mi preteriris la sidejon de la freneza knabino kaj mi vidis ke sur la ŝtonplato kuŝas freŝaj rezedbukedoj, tiuj samaj kiujn mia amiko el mia ĝardeno portadis hejmen. Efektive samaj rezedbukedoj! Mi estis multe ekmirigita.

Kiam mi foje kun Leonid Leonidoviĉ kunvenis mi tial intence tuŝis la temon pri la freneza knabino kaj diris ke nun baldaŭ venos la tempo kiam mallaŭtiĝos ŝiaj kantoj ĉar la vintro alproksimiĝas. Tute kontraŭ mia atendo mia amiko aŭskultis mian parolon kun trankvila mieno; li eĉ ne konfuziĝis kiam mi rakontis, ke mi vidis rezedbukedojn sur la ŝtono kuŝantaj kaj nur ĉe la vortoj, ke la noktaj kantoj nun baldaŭ mallaŭtiĝos mi rimarkis, ke lia vizago malklarigis, kaj videbla malĝajeco speguliĝis en liaj trajtoj. Post mallonga silentado li rediris:

“Jes, mi devas konfesi ke mi kutimiĝis, kaj ke mi nun ofte aŭskultadas la kantojn de kompatinda knabino—li ĉiam evitadis la vorton *Frenezulino*—kiuj tiel sopirene, tiel kortuŝante eksonadas tra la nokta trankvileco. Ŝi estas malfeliĉulino kaj ŝia sorto estas certe terura, sed dume ŝi povas restadi sub la pura ĉielo en la libera naturo, havante siajn florojn kaj siajn kantojn: ŝi estas certe feliĉa, eble pli feliĉa ol tiuj kiuj posedas nenion krom—sopiro, brula sopiro je la feliĉeco: tiom por ili karega, kiam ne atingebla, egale kiel neatingebla estas

por sola nokta migrulo la brila stelo sur ĉiela firmamento.

“Mi kore bedaŭros kiam mallaŭtigos la nokta kantistino ĉar tiam ŝia kantado mankos al mi, sed ankoraŭ pli mi bedaŭros ŝin mem, ke ŝi estos devigita forlasi sian verdan sidejon kaj restadi en surda putra ĉambreto por longa vintra sezono. Kompatindulino, tiam aukaŭ ŝi perdos ĉion kion ŝi amis!”

Li eksilentigis—“Kaj tamen” daŭrigis li poste, “por ŝi revenos la printempo, ekfloros ree la rozoj, ŝi ree ekkantos, por ŝi restadas la espero. Ekzistas homoj pli malfeliĉaj ol tiu ĉi knabino!” aldonis li pli mallaŭte, kvazaŭ nur por si mem.

Post tiu parolo restis Leonid Leonidoviĉ nur ankoraŭ mallonge ĉe mi, li diris cetere ke, ĉar la noktan kantistinon la floroj tiom feliĉigadas li, por plezurigi ŝin, alportadis kelkafoje bukedon por ŝi.”

Ni adiaŭdiris.

*Finota.*

<sup>1</sup> Kio povas helpi al mi nomo subskribita—kiam ne estas (ĉi tie) mia knabo, la blanka trifolieto—kaj se alvenu aroj da sinjoroj, cent-milionaroj—ne estas (ĉi tie) mia knabo, la blanka trifolieto.

[*Litva popola kanto.*]

## VIZITO AL LA KORTEGO ĤINA. Speciale verkita por “The Esperantist” de H.T.

Antaŭ kelkaj semajnoj, mi havis la honoron ĉeesti ĉe aŭdienco donata de la Popatrin-imperiestro kaj la Imperiestro de Ĥinujo al grava admiralo, kaj venas al mi la ideo, ke mallonga priskribo pri tiu-ĉi intervidiĝo povus iom interesi la legantojn de THE ESPERANTIST.

La Ministro reprezentanta nian landon ĉe la Ĥina Kortego kaj la Admiralo, kune kun siaj sekvantaroj, forlasis la Senditejon je la naŭa horo matene, en portiloj portataj ĉiu per kvar portistoj kaj antaŭenirigataj de gardistareto de kavalerio. La vojoj de Pekino, kvankam plilarĝaj ol ordinare en Ĥina urbo, estas malpuraj kaj odoraj krom en la ĉirkaŭaĵo de la Senditejoj, kie ili estas tenataj en plibona ordo. Post oftaj haltoj, por ke la alportantoj povu ŝanĝi la stangojn de la portiloj sur la alian ŝultron, ni fine eniris “La Malpermesatan Urbon”—la eniro en kiun estas kutime malpermesata al alilanduloj—tra orienta pordego, kaj trapasinte kelkajn pordojn kaj kortojn, ni malsupreniris el niaj portiloj kaj marŝis la restaĵon de la vojo.

Estis multe da Ĥinoj ĉirkaŭstarantaj, kiuj rigardis nin tre scivoleme, kaj ni estis akceptataj de la Konsilantoj de la *Wai-wu-pu*, aŭ Direktaro pro Alilandaj Aferoj. Pliagaj Mandarinoj kun kiuj ni interŝanĝis ĝentilajn salutojn, tiam nin alkondukis al la Ĉambrego de Aŭdienco. Tie ni nin trovis en modere granda kaj altega ĉambrego, ornamita de oraj surskriboj Ĥinaj. En centro estis tapiŝtatan estradon sur kiu starigis speco de alta tablo portanta kelkajn ornamojn de artefaritaj floroj. Malantaŭ la tablo sidigis Ŝia Imperiestra Moŝto en tia maniero, ke nur estis videbla la kapo kaj ŝultroj. Ŝi ŝajne havis nur kvardek kvin jarojn, sed vere havas kelkajn preskaŭ sepdek. La hararo estis aranĝita laŭ modo Manĉua; de la fizionomio oni juĝis decidecon kaj forton; la voĉo estis fortika kaj plaĉa. Facile

estis kompreni kial tiu ĉi maljuna sinjorino prenas la ĉefan parton en la registaro, kiam oni rigardis la dolĉan kaj kvazaŭ malfortan Imperiestron, kiu, sidiganta ĉe ŝia maldekstra flanko, sur malpli alta seĝo, kaj for de la tablo, ŝajnis esti junulo de dekok jaroj, kvankam li havas pli ol tridek.

Ĉe ĉiu flanko de la ĉambrego sin trovas duoblaj vicoj de Mandarinoj portantaj malhelajn purpurajn robojn, senornamitaj krom per la ilustrita simbolo de rango, portata antaŭe kaj poste. Ĉiu portis la oficialan kastoran ĉapelon kun plumo kaj butono, kaj ĉiu tenis mallongan glavon per la maldekstra mano.

La Ministro prezentis la Admiralon al Ŝia Majesto kaj al la Imperiestro, kaj la Imperiestro, faranta respondon, parolis pri la plezuro ŝi sentis akcepti oficiron de tia reputacio kaj invitis lin supreniri sur la estradon. Ŝia Majesto faris afablajn informigojn pri la vojaĝo de la Admiralo kaj sendis ĝentilajn salutojn al lia Regnestro.

Kredeble la interparolado kondukigis per tradukisto, ĉar oni kredas ke nune nek Ŝia Majesto nek la Admiralo scias paroli Esperanton, kaj la Imperiestro ne malfermis la buŝon dum la tuta aŭdienco. Estis remarkinde ke en ĉiu okazo kiam estis necese ke la Mandarinotradukisto sin adresu al Ŝia Majesto, li devis genufleksi ĉe ŝiaj piedoj. Kiel la maljuna sinjoro zorgis sin levi antaŭ ol adresi sin al la alilanduloj, la interparolado tial estis iom longa; oni povas kompreni ke li havis multe da ekzerco.

Fine finiĝis la komplimentoj, kaj farinte kelkajn malaltajn salutojn ni eliris, kaj oni nin alkondukis en apudan salonon kie ni partoprenis kelkajn refreŝigaĵojn kune kun la Konsilantoj de la *Wai-wu-pu*. Ni tiam diris adiaŭ al ili kaj al la ĉefaj oficiroj de la Kortego kaj foriris, havantaj la plezuranton esti vidintaj la plej interesantan virinon de la nuna epoko.

## FABLO.

Originale verkita de Clarence Bicknell.

Kataro foje la musaron  
De l' ĉirkaŭaĵ' al balo  
Invitis, la vesperon finan  
De l' gaja karnavalo.

“Esperas ni,” l' invito diris,  
“Ke ĉiuj kun komplezo  
Alvenos, de la oka horo  
Vespere ĝis noktmezo.”

La tre timemaj musoj tiam  
Sufervis per korbatoj ;  
Deziris ili balon iri  
Sed dubis pri la katoj.

Kaj ili, post pripenso, skribis  
“L' inviton honorindan  
Akceptos ni, se vi promesos  
Konduton tre amindan.”

“Ĉar ni memoras, malfeliĉe,  
Ke vi, je l' estinteco,  
Kaj ni malpacojn ofte havis  
Pro mank' de amikeco.”

Respondis la katar', “Pro tio  
Ne timu, gekaruloj,  
Al nia diro vi konfidu,  
Ni estas veramuloj.”

“Sur niaj koroj la pasitaj  
Malpacoj estas pezo,  
Sed ĉion vi kaj ni forgesos  
Ĉe l' bal', ĝis noktmezo.”

La musoj do akceptis kore,  
Kaj pri la preparadoj  
Pripensis kaj diskutis ofte  
Per longaj paroladoj.

La tago venis ; kaj la gastoj  
Je l' ĝusta horo oka,  
Kaj ĉiu ĉiun eksalutis  
Per kiso reciproka.

La katoj kun musinoj dancis,  
La musoj kun katinoj ;  
Ĉirkaŭkurante ili ŝajnis  
La radoj de maŝinoj.

La tempo pasis tre rapide ;  
La musoj kun fervoro  
Pligrandiĝanta ĉiam dancis,  
Nek pensis pri la horo.

Sed ĉesis la muzik' subite,  
La direktor' sidigis,  
La noktomeza hor' sonoris,  
La ĝoja bal' finiĝis.

La musoj do antaŭen marŝis  
Por centmil dankojn diri,  
Sed la kataro tuj kriegis  
“Ne devas vi foriri.”

“Ni ankaŭ estas tre dankemaj  
Kaj ĝuis la dancadon,  
Sed nun ni ĝuos *vin*, karuloj,  
Kaj bonan noktmanĝadon.”

La musoj kriis, “Ho ! perfidaj,  
Bonfaron vi promesis,  
Ĵurante ke vi la malpacojn  
De l' estintec' forgesis.”

“Sed vi akceptis,” la kataro  
Respondis, “kun komplezo,  
L' inviton de la oka horo  
*Sed ne ĝis postnoktmezo.*”

Kaj tuj la musoj malaperis ;  
Ne restis eĉ la ostoj  
Nur, kiel memorig' de l' balo  
La pintoj de la vestoj !

*La homoj kiuj veron diras  
Sen vortoj tute veraj,  
Ol mensoguloj ili estas  
Sendube pli danĝeraj.*

## LA LEGENDO PRI LA UNUA VIOLONO.

El la Franca de Jean and Jérôme Tharaud, tradukita de F. L. G. Marechal.

En la vastaj, arbaroj de Transilvanio loĝas izolaj lignotranĉistoj, meze da klararoj, en lignaj kajutoj. Por gajni sian panon, ili nur scias turnigi siajn hakilojn.

La paso de ciganoj estas kvazaŭ fulmo de gajeco por tiuj ĉi homoj, kies vivo estas tiel sovaĝa kaj tiel sensanga.

La du ciganoj portas sub brakoj unu la violonon, la alia la cimbalon, aŭ harpon kun kupraj kordoj. La harpo akompanas, per siaj saltantaj notoj, la seninterrompan melodion de la violono. La perdita vojaĝanto, kiu estas erarinta, dum la vespero, en Transilvanian arbaron kaj trovis kunvenon de lignotranĉistoj, kaj kiu vidis tiujn ĉi kaj iliajn edzinojn danci je la lumeto de mortanta fajro dum la cigano, sidanta sur falinta arbo ludas sur la kordoj de sia violono, miras pro la magia povo de tiu ĉi humila ilo. Li do komprenus ĝin, se li sciis la legendon pri la unua violono.

Antaŭ longa tempo, en Transilvania arbaro, apud klararo, loĝis kun siaj gepatroj kaj fratoj bela knabino, kies nomo estis Macha. La familio loĝis en kajuto, per arb trunkoj konstruata, kaj kovrata per muskoj. La patrino kaj filino kudras la haŭtajn vestojn, kuiradas la viandon kaj boligas la supon. Ĉiumatene, dum la bela vetero, la patro eliras kune kun siaj filoj, kun pezega hakilo sur la ŝultro. Kvinope, ili atakas grandegan arbon. Ili ĉesas frapegi nur kiam la falo de la arbo proksimiĝas. Tiam Konstanteno, la plej juna, montis por fiksi ŝnuron ĉe la pinto de la arbo. La kvin filoj tiras, la patro donas lastan hakegon, kaj la arbo falas bruege. Tiam ili detranĉas la branĉojn, forprenas la ŝelon, kaj la blankaj kaj glataj trunkoj de la abioj naĝas sur torento ĝis la valo.

Ilia vivo pasiĝis feliĉe kaj pace.

Macha similas al siaj fratoj. Sed tiuj ĉi estas malbelaj kaj ŝi estas belega. Ŝi havas adorindan flavruĝan haron, kies la liberaj ondoj falas sur la dorso kaj, sur la tempio du grandaj bukloj, kiel du riveretoj, fluas sur la perla blankeco de la vangoj. Ŝi havas la grandajn blujn okulojn de la Valaĉiaj filinoj. Ŝi konis ĉiujn kantojn de la montaro. Per ŝi la kajuto florornamiĝis, dum la somero, de ĉiaj floroj el la arbaro. Ŝia patrino adoregis ŝin, ŝia patro, kiam li parolis al ŝi dolĉigas la sonon de sia voĉo; ŝiaj fratoj revis, en la arbaro, pri la donacoj kiujn ili povus al ŝi donaci. Trajano, la plej maljuna, atakis per hakilo ursojn, por doni al ŝi la felon. Romo serĉis inter la silikoj rarajn ŝtonojn el kiuj li, antaŭ kelkaj jaroj, konstruis por ŝi ĉirkaŭ-kolon je barbara lukso. Konstanteno

montis al la pintoj de la plej grandaj arboj por trovi birdojn, kaj Liveo iris al la vilaĝo por serĉi kelkajn papavajn kukulojn.

Macha ricevis tiun ĉi adoron kiel io natura. Longan tempon ŝi deziris nenion plu. Sed iom post iom la infaneco pasiĝis, kaj ekfloris juneco. Ŝi tiam ekrevis pri nekonataj aferoj.

Nur ŝia patrino devenis tiujn ĉi novajn sentojn, kiujn posedis Macha, kaj ŝi fariĝis eĉ pli karesanta kontraŭ ŝi. La patro kaj filoj estis malfeliĉaj kaj poste koleraj pro la malvarmeo je kiu Macha nun akceptis iliajn karesojn kaj donacojn.

De la klararo, sur kiu estis la kajuto, Macha povis vidi sur la supro de monto la grizajn murojn de kastelo. Ofte ĝi kontraŭstaris sieĝojn, kaj la flamoj, kiuj lekis la murojn, postlasis grandajn nigrajn fulgajn langojn. Oni rakontis strangajn historiojn pri la sen-homa kastelo, kaj la lignotranĉistoj ne preterpasis la ombrojn de la turo nokte.

En tago, Macha vidis flugeti ĉe la supro de tiu turo grandegan silkan flagon. Oni diris en la arbaro, ke la filo de la kastel-mastroj revenis. La arbaro, kiu jam de longe nur konis la sonon de hakiloj, la falon de abioj, betuloj kaj kverkoj, nun resonas per la sono de la ĉaskorno, per la bojo de la ĉas-hundoj.

Estas la fino de aŭtuno. Macha portas en korbo, al malproksima kunvenejo, kie laboras ŝiaj fratoj, lignotelerojn da supo. Ŝi, por la unua fojo, aŭdas la galopon de ĉevalo. Ŝi elsaltas el la vojo, kaj kaŝas sin malantaŭ kverk-trunko kaj atendas. Subite, el la fino de mallarĝa aleo ŝi vidas alproksimiĝi, inter la oraj folioj de la flaviĝa arbaro, kavaliron belevestitan, kiu rajdis belan blankan ĉevalon, selata de verda ledo.

Kiel ventego li pasas antaŭ ŝi. La vento de la trakuro flugetigis lian mantelon, fazanplumo tremetas en lia fela ĉapo kun ora rando. Lia arĝenta ĉas-korno frapas la ŝelon.

Per la dekstra mano li tenas grandan bastonon.

Macha rave rigardas la kavaliron, malaperanta inter la arboj.

Tiu ĉi viro apartenas al alia gento ol ĉiuj homoj, kiujn ŝi antaŭe vidis. Li estas pli bela, li estas pli fleksebla, pli riĉa. Ŝiaj pensoj devas esti tiel malmultaj, kiel ŝiaj vestoj! Plena de dolĉega sento, kiun ŝi neniam antaŭe sentis, Macha de tiu tago atendis en la arbaro la "arĝentan kavaliron." Ŝi ofte revidis lin, sekvantan cervon, sed ŝi ne kuraĝis sin montri, kaj nur rigardis lin de malproksime, kaŝata malantaŭ ŝtonego.



Unuvesperon, kiam la lacega kavaliro revenis malrapide, ŝi kuraĝiĝis prezenti al li fruktojn en korbo; alian tagon ŝi donis al li akvon en ligna pokalo, alian tagon amason de floroj, kiuj ekfloras sub la unua neĝo—la lastajn florojn de la jaro. La kavaliro prenis la fruktojn el la korbo; trinkis la malvarman akvon el la pokalo; akceptis la florojn kaj senhalte preterpasis, ne eĉ rigardinte la junan Machon.

Tiam alvenis la granda vintro. La kavaliro restis en sia kastelo, kune kun la servistoj kaj hundoj. Macha, en la gepatra kajuto, revis pro la argenta kavaliro, atendente la printempon kun ama febro.

Fine la printempo anonciĝis en la arbaro: la sezono por ĉasi revenis por la kastelmastro.

Liveo elportis el la vilaĝo por Macha ruĝajn ŝuojn. Ŝi surmetis sian plej belan veston kaj pelton kaj atendis la kavaliron ĉe voj-kruco de la arbaro. Li aperis al ŝi en sia gloro.

La radioj de la suno, kiu kuŝiĝis malantaŭ la senfoliaj arboj, brilegis sur la argenta vesto kaj la ĉevalo, gaja pro tiu ĉi unua ekskurso post la longa vintro, saltegis kaj blekis.

Macha ekkantis:

“Bela kavaliro, bela kavaliro,  
Venu al mi, tiun ĉi printempo!  
La birdoj kantas sur la branĉoj  
La ruĝaj ŝuoj estas por plaĉi al vi,  
Bela kavaliro, bela kavaliro!”

Sed la bela kavaliro preteriris, senaŭdi la kanton, kaj Macha ne plu povis aŭdi la piedfrapadon de la ĉevalo, kaj ekploris.

Ŝi ploralis nokte kaj tage, ĉar la kavaliro ne volis ami ŝin. Malespero plenigis ŝian koron, kaj la ideo envenis en ŝian kapon, ke ŝi demandu helpon al la potenculoj de la Infero.

Macha estis sola en klaraĵo, nigrita per la restaĵoj de antaŭa kunveno. La kvarona luno levigis malrapide sian duoblan kornon supre la arboj de la arbaro. Kverkoj etendis sur la juna fraŭlino la ombron de siaj branĉoj, kiel manoj. Malproksima perdita hundo bojis. La horo kaj la loko estas indaj por alvoko al la Diablo!

Subite ŝi kriis: “Al mi, Diablo, al mi!”

Tuj, el la trunko de maljuna tondrofrapita kverko duone mangata de formikoj, elvenis stranga estaĵo, kies ruĝaj ŝuoj estis fiksataj al la subbrakoj kaj kiu, anstataŭ ĉapo, portis sur la kapo vastan kok-kreskilon. Li tenis en la manospuglon. Gentile li demandis al Macha: “Kion vi volas?”

La juna fraŭlino respondis per forta voĉo: “Mi amas viron, kiu ne volas ami min.”

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn, la demono ridegis, kaj la ridego ne ekvekis ian eĉon en la naturo.

“Mi volas vin helpi. Prenu tiun ĉi spegulon. Prezentu ĝin al via amatulo kiam vi vidos lin. Kiam lia vizaĝo rebrilos sur tiu ĉi kristalo, li amos vin je amo.”

(*Dadrigola*)

(*Author's Copyright*).

(*Eldonraĵo de la Aŭtoro*).

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

En la unua porcio de tiuj ĉi Memoroj, mi diras, ke mi eliris sur la lignan flank-promenejon. Tiun vorton “lignan” mi deziras akcentegi, ĉar en tiu ĉi vilaĝo (se oni ekceptas du aŭ tri brikajn konstruaĵojn) ĉio estas ligna.

Ligna flankpromenejo, kiu konsistas el lignaj tabuloj, altigitaj per lignaj subportiloj, kondukas al lignaj vendejoj kaj lignaj domoj.

Mi loĝis en domo, kiu staras aparta, kaj de mia domo la flankpromenejo etendas sin kiel ponteto super la verda kamparo, ĉar tie ĉi la kampoj atingas la straton.

Inter tabulo kaj tabulo oni lasas negrandajn interspacojn por ke la pluvo facile trapasu. Kompreneble la herbaĵo povas ankaŭ trapasi *supren*.

Mi tre ŝatis mallevi la okulojn kaj rigardi tra la interspacoj la verdaĵon kaj la florojn.

Sed ne sole la kampoj atingas la straton; la bestoj ankaŭ ĝin atingas, kaj libere vagadas sur ĝi. Tie tre ofte mi vidas ilin trankvile sin paŝti. Pro tio mi ne estas surprizata kiam mi vidas *Boviston* kaptante per ŝnurkaptilo, ĉevalidon.

“*Boviston*,” mi diras, sed tiu ĉi ne estas akurata traduko de la Amerika nomo “*Cow Boy*” (*Bovina Knabo*).

Al tiuj, kiuj ne konas tiun ĉi nomon, mi diras, ke la *Bovina Knabo* tute ne estas knabo sed viro, kiu sur la Amerikaj herbejoj gardadas la brutarojn.

Lia nepartigebla kunulo estas sia ĉevalido (Poney) kiu ankaŭ estas altkreska ĉevalo, kaj li ĉiam kunportas grandan kaptoŝnuron kaj turn-  
pileton, ambaŭ el kiuj li uzas lertege.

Tial la vorto "knabo" signifas "viro" kaj la vorto "ĉevalido" signifas "ĉevalo."

La Bovisto kiun mi nun ekvidas nur sin amuzas jetante sian ŝnurkaptilon de la flankpromenejo. Tre larĝa ĉapelo, ornamita de pecetoj de flavkupro, kovras lian kapon; ĉirkaŭ liaj oreloj pendas longajn harbuklojn, kaj sur liaj kruroj li portas grandajn botojn kun spronoj. Vere tre stranga sed tre pentrinda figuro estas tiu de la Amerika Bovisto—la Hispana *Vaquero*.

La drogisto estas elirinta el sia vendejo por kuraĝigi la Boviston.

Li ankaŭ portas tre strangan ĉapelon. Li havas ĉirkaŭ la kapo kaj frunto kvazaŭ larĝan ledvindilon (se vi figuras ke li estas metinta ĉirkaŭ la kapo banderolon de gazeto, sed ledan banderolon, vi figuras tre ĝuste). En tiu banderolo estas fiksataj kvar maldikegaj bastonetoj, subtenante malpezegan sunombreton, kiun li povas altigi aŭ klinigi laŭ sia deziro, dum la aero libere trapasas inter ĝi kaj la supraĵo de lia kapo. Li tre laŭdas sian ĉapelon, tamen ŝajnas al mi ke, por la salutado, ĝi ne estas tute konvena.

Kiam mi mem, kun mia larĝa sunombrelo estas alveninta al ili, ni prezentas, mi supozas, tre rimarkindajn, eĉ eble ridindajn, figurojn.

La vilaĝo staras sur flanko de monteto, kaj pense mi nun malsupreniras la deklivon ĝis la rivero. Tiu ĉi ne estas la "Creek" (rivereto) pri kiu poste mi parolos. Se la leganto trovos en sia vortaro *Creek*, *Golfeto*, li ne miru. La uzo de la vorto *Creek* por rivereto estas tute Amerika.

Ĝi estas vera rivero. Sed oni ne devas pensi pri klara akvo en kiu oni povas vidi ĉiun ŝtoneton. Neniel! Mi parolas pri unu el tiuj larĝaj malrapidegaj kaj malpuraj riveroj, kiuj ŝajnas ne kuri, sed rampi.

Ĉu mi diros Irlandaĵon? Mi ofte deziras lavi la riveron!

Mi estas mem akvotrinkulo, kaj al tiu ne estas ĝojige trovi en sia glaso dikan tavolon de ruĝa polvo; nek al siofulo estas plezure lasi stari sian glason duonon da horo, por ke la polvo amasiĝu ĉe la fundo.

Nature mi riproĉis al la kelnero: "Ĉu vi ne havas filtrojn?" "Ho jes, certe. Tiu ĉi akvo jam estas filtrita. Vi devas ĝin vidi antaŭ ol ni ĝin filtris!"

Foje, ĉe hotelo, mi vidis en la karafo ne sole polvon, sed ankaŭ malbelegan kaj ege aktivan insekton. Ugh! Mi ne estis sufiĉe soifa por trinki tiun akvon!

Tamen ĉe diversaj grandaj Amerikaj urboj mi trovis la akvon tre bongustan. Oni boligas ĝin, densigas la vaporon, kaj reoksigigas ĝin.

Sur la rivero naĝas pramo en kiun mi eniras kune kun mia kunulo, kaj tiamaniere trapasas la riveron. Alvenintaj ĉe la alia bordo, ni elŝipiĝas, kaj, kun granda intereso interparolantaj pri miaj aferoj ni ne rimarkas, ke ni eniris grandan kampon da maizo. Subite mi ekvidas ke, krom la kreskaĵoj kaj la mallarĝa vojeto ĉe niaj piedoj, ni povas nenion vidi. Starante sur la pintoj de la piedfingroj mi elstreĉis supren ĝis la plena etendo, mian brakon sed eĉ tiel mi ne povis tuŝi la supron de la kreskaĵo. Mi tute komprenis kiamaniere oni povus sin perdi en tia gren-kampo.

Mi diris en la unua porcio, ke unu el la karakterizoj de la ŝtatoj estas la multegeco de la Insekta Vivo. Ĉe ĉiu paŝo mi havis la senton tiel, kiel se ni subpremigas multegon da akridoj. Kredeble ĝi estas nur senton, ĉar tiuj insektoj estas treege aktivaj, kaj mi trovis ilin plej ofte ĉe la supro kaj ne ĉe la malsupro de miaj botoj.

Mi sentis ke mi estas "Gulivero" kaj ili la "Liliputaj" ĉevaloj kiuj sursaltas miajn piedojn. Mi devis imagi la rajdantojn. Certe mi aŭdis sonon, kvazaŭ de multego da siblaj voĉoj.

Tiu sono estas por mi iom tro inspira, ĉar ĝi similas al tiu de la son-serpento (rattle-snake), kvankam oni povas facile ilin distingi; kaj mi ne tre ŝatas la bruon de la akridoj pri tio, ke foje, vespere, mi estis postsekvata de son-serpento. La morgaŭan tagon oni mortigis ĝin. Ĝi estis dekkvar futoj longe kaj havis dekkvar sonorilojn (rattles). Se oni diras la veron, dirante ke ĝi ricevas novan sonorilon ĉe ĉiu jaro, ĝi havis ankaŭ dekkvar jarojn.

Fine la farmamastro nin trovis vagantajn sur siaj kampoj, kaj afable montris la ni la farmon, ĉiam klarigante la ĝustan koston de ĉiu afero kiun li montras al ni.

Kelkaj Amerikanoj, se vi dirus al ili: "Kia ĉarma vidaĵo!" respondus: "Jes, la tero valoras po kvin dolarojn la Ejebro (Acre = 40 da Hektaro).

Tiaj Amerikanoj demandas al vi la koston de viaj vestoj, via poŝhorloĝo, de ĉio, kion vi portas.

Mi kredas ke se unu el tiaj Amerikanoj (ili estas nur unu tipo de la vere potenca raso) estus pendigota, li demandus al la pendigisto la koston de la ŝnurego, tia estas la forto de la kutimo!

Tamen tiu scivolemo ne estas malĝentila, almenaŭ laŭ la intenco. Kontraŭe, la scivoluloj estas tre bonaj, tre gastamaj, kaj faros al vi multajn amindaĵojn.

Mi havas tre koran memoron de miaj Amerikaj amikoj.

## LA FAJRTRAPASADO.

Priskribo de ceremonio kiu okazis en Pondicherry (Hindujo) en jaro 1901.

Estas la kvina horo vespere, en bela somera vetero. Nia puŝ-puŝ (homŝovata veturilo) estas interpuŝata inter multe da gaje vestataj viroj, kiuj amasiĝis sur la strato.

Duonon ĥoron ni tre malrapidas sur stratoj flankataj de budoj, malkaraj bazaroj, bufedoj, k.t.p., kaj fine atingas la kuŝejon de la rivero (kiu en tiu sezono de la jaro estas tute seka kaj senakva). Tie ĉi okazos la ceremonion.

Ĉirkaŭ la loko oni povas vidi nur homajn kapojn, kiuj aperas, vico super vico; la tuta pentraĵo estas kvazaŭ flamego de hela koloro.

Antaŭ ni estas ligna konstruaĵo, kie sidigas oficistoj kaj kelkaj gravaj urbanoj; ankaŭ multaj sinjorinoj, kiuj alportas iom da diverseco al sceno kie alie ĉeestis nur viroj.

La konstruaĵo apudestis kvadratan terpecon, kiu similis malprofundan fosajon plenigata de dika tavolo de brulantaj karboj.

Tiu ĉi fajro estas senlace incitata kaj bruligata de kelkaj laboristoj, ĝis kiam oni tute ne povas alproksimiĝi la lokon, tiel varmega estas la ĉirkaŭfluenta aero.

Subite oni ekaŭdas la sonon de Hinda muziko, kaj tien ĉi rapidas la dio kaj diino, portataj sur la ŝultroj de siaj adorantoj.

Granda amaso procesie sekvas la gediojn kaj multaj el la sekvantoj ĵuris, dum la pasinta jaro, trapaŝi tra la fajro en tiu ĉi tago.

Ili tion ĉi ĵuris, aŭ por ke ili deturnu ian malbonaĵon, kiu ekminacas ilin, aŭ en dankema

memoro ĉar iu malsana aŭ malsaneta dum la pasinta jaro feliĉe tute resaniĝis.

Tiuj, kiuj intencas trapaŝi la fajron fastas la tutan tagon, sin banas kaj nun aperas ĉirkaŭataj de floraj girlandoj.

La procesio trifoje ĉirkaŭmarŝadas la fajron, kaj fine oni starigas la diojn, vidaĵoj al la oriento.

Je antaŭkonsentita signalo, la ceremonio komencas.

La adorantoj tramarŝas tra la mezo de la fajro; ili trapasas tra la longeco de la brulanta fosaĵo, kiu havas eble kvin jardojn da longeco (preskaŭ kvin metrojn).

Ili malrapide, mi certigas al vi, kaj en tre orda maniero, trapaŝas ĝin, kun tute sendolora mieno.

Oni tie vidas multaj adorantoj, kiuj portas sur ŝultro malgrandan idon. Tio ĉi okazas, precipe inter malalt-rangaj familioj, ĉar ili kutimas fari religian promeson ke, se malsanuleto resaniĝos, ili devos trapaŝi tra la fajro dum la plej proksima festo. Sed ili kredas, ke la kompatema dio ne volas igi timeman infanon sole trapaŝi la fajron; sekve la ido estas portata sur ŝultro de la patro, kaj la religia ĵuro estas tiamaniere plenumata.

La ceremonio finite, la amaso bruegeme disiras, senrapide kaj nepre diskutante la juŝviditan ceremonion, ĝiajn meritojn kaj malmeritojn rilate al aliaj antaŭaj festoj.

Tiu ĉi bruego, tumulto kaj konfuzo oni neniam povus skribe komprenigi al okcidentulo.

## ST. ANDREWS EN SOMERO.

Originale verkita de J. T. Haxton.

Estas la mezo de la sezono en la antikva griza urbo apud la maro. La bela ĉefstrato brilas per la helaj someraj vestaĵoj de la virinoj, kaj la krioj kaj fluetanta ridado de infanoj falas dolĉe sur la oreloj.

Tiu ĉi strato, kiu prave fierigas la anojn de St. Andrews, estas en somero vere vidindaĵo. Ĝi estas longa, sed ne tro; larĝa, sed ne tro; ne tro ebena, ne tro rekta, ornamata de flolvazegoj, flankata de nun foliplenaj tilioj kaj de multe da puraj, bonezorgataj butikoj.

Ĉe unu fino estas la antikva pordego, bone konservata, kie oni prezentis al reĝo Karlo II. en 1650 la arĝentajn ŝlosilojn de la urbo.

Ĉe la alia fino estas la restaĵo de la vasta katedralo, kiu detruigis dum la Reformiĝo, kaj estas eĉ nun nobla en ĝia ruino.

Meze de la strato estas la Pastro-kolegio, la Universitata Biblioteko, la Poŝtoficejo, la Urbestrejo kaj la Urbopreĝejo.

Eble la ĉefa rimarkindaĵo pri la strato, kiel eĉ pri la tuta urbo, estas la stranga mikso de la antikva kun la moderna.

Sed kiel ni promenas laŭlonge tiu ĉi admirinda strato "sub la tilioj," ni vidas virojn pretigante du veturilojn por veturi la unu al Crail (Krel) malgranda marborda urbo malproksime ĉirkaŭ dek mejlojn, la alia al Dura Din, bela valetio.

La vojaĝontoj apudstaras. Jen feliĉaj geedzoj kun bela filineto; jen malagraba, gala, maljuna fraŭlo; jen la ĝojega mezaĝa viro, kiu ŝercas kaj kore ridas kun siaj amikoj, jen la nerva virino, kiu senkonfide ektramas pro ĉiu movo de la ĉevaloj.

Fine, ĉiu enestas kaj ĉio estas preta kaj, kun horo de amikaj adiaŭtoj ili forveturas, la radoj gaje bruante sur la ŝtonoj.

Sed ni devas trovi la vojon al la herbejoj aŭ "Links," ĉar ĉio en St. Andrews ekzistas pro la ludo Golf. De longega tempo tiu ĉi ludo ludigis sur la famaj herbejoj, kiuj estas sendube la plej bonaj en la mondo. Tie ĉi junuloj kaj maljunuloj—mi ja devas diri gejunuloj, ĉar tiom da fraŭlinoj ludas nun la "reĝan kaj antikvan ludon"—trovas sanon kaj forton, ludante sian amatan ludon.

Homoj venas de ĉie, proksime kaj malproksime, por peli la "fajfantan pilketon" sur la herbo. Tion ĉi ne povas kompreni tiu, kiu vidas la ludon unufoje. Ĝi ŝajnas esti tre facila kaj neinteresa. Estas necese, ke oni prenu la bastonon kaj penadu irigi la pilkon por eltrovi kiom da arto estas en la ŝajnsimpla ludo.

Tion ĉi kiam oni eltrovas, preskaŭ senescepte

oni decidas ke oni devas akiri tiun ĉi arton. Tiel komencas la "Golf-febro!"

Sed en St. Andrews, golfo ne estas nur ludo. Per ĝi centoj da viroj trovas okupadon—servante la ludantojn; konservante la herbejon; fabrikante la ludilojn; portante la bastonojn; instruante lernantojn.

Vivu do la Reĝa Ludo!

Proksime al la golf-ludejo estas la marbordo, kie grandaj amasoj da infanoj ludas, konstruas sablokastelojn, rajdas sur azenoj, kaj sin banas en la maro.

Apud la maro kaj en la moderna kvartalo de la urbo sin trovas multaj belaj domoj, sed en la antikvaj partoj la antikvisto trovas feliĉan ĉasejon.

Ĉar St. Andrews estis iam la eklezia ĉefurbo de Skotlando, kaj tial enhavas ruinojn de multaj preĝejoj, kiuj tenas ĉirkaŭ si memorojn pri la Skotaj religiaj malpacoj. Oni ankoraŭ montras la lokojn, kie la sorĉistinoj dronigis kaj kie la turmentitoj bruligis.

Resume, por ĉiu, la scienculo, la antikvaĵ-amanto, la gaja plezur-serĉanto, la resaniganto; ĉiu trovos ion plaĉan en tiu ĉi griza, malnova, universitata urbo ĉe la rando de la Norda Maro.

## LA INSULO MARGARITO.

De G. O. Messerly.

Mi alvenis tien ĉi post unutaga vojaĝo de Trinidad, per vaporŝipo de la "Royal Mail Company."

Ni unue atingis Carupanon, haveno sur la "Costa Firme," kie ni trovis la maron tre maltrankvila. Samtage ni lasis tiun ankorejon por veni al Margarito, Venezuela insulo lokita ĉirkaŭ kvindek mejlojn norden de la Venezuela ĉeflando.

La vidaĵo estas bela kaj la marbordo estas poezia tiam, kiam oni kontempladas ĝian belecon kaj vastecon, kaj la belecon de la malproksimaj montoj.

Sennombraj velŝipoj de perlfisistoj estas videblaj. Ili serĉas kun pacienco la ĉefan riĉecon de tiu ĉi insulo, kaj ilia nombro kreskadis kaj kreskadis tiel rapide, ke mi pensis ke ili estis nekalkuleblaj.

La ĉi tieaj perlfisistoj uzas la *arrastra* aŭ skrapilon, kiu kolektas en sako ĉiujn perl-ostrojn kiujn ĝi trovas antaŭ ĝi sur la fundo de la maro. Poste la fisistoj suprentiras la skrapilon kaj elektas la pli grandajn ostrojn. Tiuj ĉi estas malfermataj

kaj la viando estas metata en kaldronon kaj kuirata ĝis kiam ĝi iĝas kvazaŭfluida.

La supo estas poste forĵetata, kaj la perloj, kiuj restas sur la fundo de la kaldrono, estas lavataj en malvarma akvo. Tiam la perlo, la plejamata juvelo de belaj sinjorinoj, aperas brilanta sed . . . multekosta!

La Margarita popolo, kies raso estas miksaĵo de Kariba kaj Kaŭkaza sango, estas bonkora.

Ilia devizo estas *Hoy* (hodiaŭ) por ricevi, kaj *Mañana* (morgaŭ) por pagi; sed alimaniere ili estas honestaj kaj aktivaj komercistoj. Iliaj ĉefaj komercaĵoj estas Perloj, Kafo, Maizo, kaj Kapra-haŭtoj, kaj ili faras grandan komercadon kun Trinidado kaj Curaçao.

Mi mem estas, mi kredas, la unua Venezuelana Esperantisto sed ne la sola, ĉar mi jam varbis kelkajn, kaj mi ĉiam klopodas!

La plej malbonaj malamikoj de nia lingvo en Venezuela certe estas la literoj c, ĝ, ĥ, ĵ, kaj ŝ ĉar iliaj sonoj estas tute neŝatataj de la loĝantoj de la patrujo de Bolivar.



## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!

THE INTERNATIONAL MACHINE.

Unbound by ties of nationality:  
The common bond of union of all civilised peoples.

The Remington can be supplied fitted for  
Esperanto.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., London, E.C.

## La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMASINO.

Prpensu je tio!

LA INTERNACIA MASINO.

Tute liberigita de naciaj ligiloj:  
La Komuna unuigilo por ĉiuj civilizitaj popoloj.

La Remington estas liverita kun Separanta  
pruŝtilaro.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Gracechurch St., Londono, E.C.

### A ĈIUJ, NI POVOS PARADIZON IRL.

|                       |                        |
|-----------------------|------------------------|
| Kiu bone trovas,      | Tiu certe ne penas.    |
| Tiu bone dormas,      | Nu, ĉar tiu ne penas.  |
| Kiu bone dormas,      | Paradizon eniras.      |
| Tiu ne penas malbone. | De nun, bone trovas.   |
| Kiu ne penas malbone. | Kaj si paradizon iras. |

Por tio li, oni devas esti flegema viraĵo. Kaj fin fari ti —  
Sro. Ch. Jaffan en Mercury (S. & L.) France.

### The "Review of Reviews"

Is the Best Magazine for Busy People.  
And it is read by "Esperanto" Students.

The aim of this Magazine is to make the Best Thoughts of  
the Best Writers universally accessible at a Trifling Cost.

The busiest and poorest in the community may here take  
with intelligent interest the great movements of Contemporary  
History.

Post Free for Twelve Months, 8/6.

10 fr. 70 c., or 3.25 marks.

Office: BOWERAY HOUSE, NORFOLK ST., LONDON.

### FOR SALE.

160-GUINNA 'BROADWOOD' GRAND PIANO  
for £65. In fine condition; Rosewood.  
For all particulars write to THE EDITOR.

### LITOGRAFAĴOJ BEZONATAJ.

Sro. WALTER H. MEIGH desiras sciti Francianojn  
Germanajn litografistojn por la ordinarigo de parolado.  
Skribu al li ĉe Ash Hall, Stoke-on-Trent, England.

### Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi.

Sro. A. C. BODY, 34, Greenbank Avenue, Plymouth. Desiras interŝangi ilus. p-k. kun alilandaj (Esperantistoj).

Sro. OSCAR FOGATSCHEWICZ, Strebrenica, Boŝnia. Nematitata fotografanto, deziras koresp. per ilus. p-k.

Frl. HELEN E. JONES, 44, Church Street, Stanley, Liverpool. Desiras koresp. kun ŝiulandaj gejunuloj per  
ilus. p-k. Ĉiam respondos.

Frl. MITCHELL, Acuba House, 85, Marquess Road, Canonbury, London, N. Kun ŝiulandanoj per ilus. p-k.

Sro. WALTER H. MEIGH, Ash Hall, Stoke-on-Trent, England. Desiras inters. voborajnu ilus. p-k. kun  
ŝiulandanoj, krom Francianoj kaj Britanoj.

Srino. FRED POLLOCK, 1, Buckingham Terrace, Glasgow, Scotland. Desiras kores. kun Galendoj  
Esperantistoj per ilus. p-k. Tuj & ĉiam respondos.

Sro. J. WIRBENLEY, 11, Montrose Terrace, Plymouth. Desiras interŝ. ilus. p-k. kun alilandaj Esperantistoj.

Sro. HARRY L. WILTSHIRE, Pierrepont House, Chippenham, England. Desiras kor. kun alilandanoj per  
ilus. p-k. Tuj & ĉiam respondos.

La Koste de la Enskribo estas ĉi. (70c. poŝtmarkoj).

# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtral.  
FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjacsckaja 24, leg 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

N.B.

*Oni povis sendi la abonpaĝon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

17. [Vol. II., No. 3.]

MARTO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## KAPELO EL OSTOJ.<sup>1</sup>

Originele verkita de D<sup>ro</sup> G. Busuttill.

Unu el la kuriozaĵoj de nia insulo Malto, aŭ pli bone de la tera globo, certe estas malgranda kapelo, kiun niaj fremdaj vizitantoj bone konas sub la nomo de "Kapelo el Ostoj." Ĝi kuŝas sur la okcidenta flanko de nia Granda Haveno apud la fortikaĵo Sankta Elmo. Antikve ĝi estis nur Enterigejo kie ripozis la ostoj de tiuj Maltaj militistoj kaj kavaliroj de la Ordeno de Sankta Johano Baptisto, kiuj kontraŭbatalis kaj venkis la Turkojn dum la famega sieĝo de la jaro 1565a.

Je la jaro 1619a komandatoro G. Nibbia konstruigis sur la enterigejo malgrandan preĝejon, kiun li dediĉis al "Tre Sankta Nomo de Mario," sed kiun vulgare oni nomas "La Virgulino'n de la Enterigejo." Tiu Enterigejo troviĝas en la preĝeja postaĉambro.

Je la jaro 1850a oni elfosigis la ostojn por ilin aliloke enterigi, sed pastro proponis ornamo per tiuj homaj restaĵoj la preĝejan postaĉambro. La propono estis akceptata, kaj la pastro pacience la ostojn tiamaniere aranĝis, ke li aliformigis la ĉambro en ion misteran, similan al la morta regno.

La unuan fojon kiam mi eniris en la kapelon mi ne scias kio min plu mirigis, ĉu la mistera vidigo, ĉu la preskaŭ mozaika vidaĵo, kaj mi ne povis bone difini ĉu la unua impresio estis terura au mirega; eble ĝi estis miksaĵo de miro kaj teruro—miro pro hela kaj vere mirigiga ordo de la ostoj—teruro pro la nevidebla, sed reala apudesto de la morto.

Antaŭ la kapela postamuro troviĝas altaro montrante el antaŭflanko latinan surskribon kiun malsupre mi tradukos Esperanten. Apud la muro nigre pentrita, blanka statuo de la Virgulino kun ŝia Infano elstaras meze de granda kadro kunmetita el ostoj (femurostoj kaj kranioj alterne). Ĉiuflanke de la altaro mi vidas niĉon en kiu elstaras la tempa simbolo, nome—Skeleto tenante per ĝia dekstra mano, falĉilon.

La antaŭaĵo de la kapelo konsistas el granda navo kunmetita el ostoj precipe el kranioj.

Jen estas la traduko de la latina surskribo :—

La universala teras fero estas teatro ;

Homa vivo estas tragedio :

Ĉio iluzio ; ĉio ŝajno.

La morto estas la lasta linio de ĉio.

Ĝi malkovras, kaj ĉion solvas.

Vi kiu vivas tion ĉi pripensu ;

Pregpetu (de Dio) la lumon eternan por tiuj, kiuj ĉi tie ripozas

Foriru kun paco kaj senĉese memoru, ke vi mortos.

Ĉu pace foriri eble estis ? Mia flanke la kompanio de tiuj kranioj, skeletoj, k.t.p., longatempem persekutis.

<sup>1</sup> Tiu ĉi artikolo jam aperis en la manskribita gazeto "Voĉo Internacia." (Rondestro: S<sup>ro</sup> H. Hodler, Geneva).

## MONATO POST MONATO.

Niaj legantoj estos kontentaj eklerni ke la Oficiala liberigo, pri kiu ni skribis lastan monaton, ja alvenis, kaj ke nia bona Estro revenis Varsovion por daŭri sian trankvilan Proesperantan laboradon, anstataŭ ol vojaĝi en Mandĉurujon. Kvankam ni bedaŭras la kaŭzojn kiuj efektivigis tiun ĉi liberigon de la milita deĵoro, kaj volus ke D<sup>ro</sup> Zamenhof estu pli forta kaj en pli bona sano, ni tre ĝojas ke li povos alporti la veran Sigelon de la Lingvo al Boulogne en Aŭgusto, kaj tiel donos al la Kunveno tiun signifon kiun ni ektimis tie mankus.

Sendube oni aranĝos tie ion pri la jam de longe pripensata Internacia Komitato. Ŝajnas al ni ke la fondigo de tia organizaĵo estas tute necesega por aŭtoritate enkonduki novajn vortojn por la kreskantaj bezonoj de viva lingvo. Kompreneble nur tiuj radikoj jam en la *Universala Vortaro* estas la nunaj fundamentaj radikoj de la lingvo, kaj ĉiuj aliaj necesaj vortoj enkondukiĝis de diversaj Esperantistoj. Eĉ la kreinto mem de la lingvo nur donis sian aprobon al tiuj lastaj vortoj, ne kiel leĝ-donanto, sed nur kiel la Esperantisto plej kompetenta fari la elekton.

Ni do ĉiuj atendas iom senpacience la fondigon de tiu centra Komitato. Kompreneble ĝi devos esti *internacia*; sed ni kredas ke niaj malproksimaj legantoj en Ameriko, Afriko, Azio kaj Aŭstralio devos skribe sendi siajn proponojn rekte al D<sup>ro</sup> Zamenhof por lia konsidero, por ke ili submetiĝu je la Bulonja Kongreso, kiu kredeble enhavos anojn el preskaŭ ĉiuj Eŭropaj landoj. Sed eble la anoj de nia plej nova Grupo, tiu de la Hinda urbo Udipi, ne povos tie aŭdigi siajn voĉojn kun siaj preskaŭ samagaĵaj Grupanoj de Folkestone.

La fondo de Grupo en tiu ĉi urbo estas tre plezuriga, kaj pensigas nin denove pri la somera vojaĝo al la *Kvin Havenoj*, pri kiu ni jam ekpensas.

La Kapitano Capé, kiu nepre ĉeestos, ĵus donis al la Esperantistaro belforman kaj bonan tradukon de *La Unua Ĉapitro de Miaj Memorskriboj* (kosto 75 c.), de François Coppée, la fama Franca verkisto, kiu donas sian varman aprobon al Esperanto. Ankaŭ nia bone-konata verkisto, Sam Meyer, eldonigis sub broŝura formo la humoran unuaktan komedion "La Supujo" (16 paĝoj, 40 c.).

Sed el Peruo alvenas plej notinda teknika libro, *Rezisteco de la Ferkolonoj*, de D<sup>ro</sup> Federico Villareal. Ĝi estas grand-forma 69 paĝa verko, en la lingvoj

*N.B.*—*La Redaktoro forveturos (D.V.) alilanden je la fino de Marto & varmege petas, ke oni sendos ĉiujn artikolojn por No. 19 antaŭ Marto 28.*

## MONTH BY MONTH.

Our readers will be pleased to learn that the Official exemption, of which we wrote last month, has arrived, and our good chief has returned to Warsaw, to continue his pro-Esperanto work instead of journeying to Manchuria. Although we regret the circumstances which brought about this exemption from military service, and would wish that Dr. Zamenhof were stronger and in better health, we are exceedingly glad that he will be able to bring the true Seal of the Language to Boulogne in August, and will thus give the Congress that significance which we had begun to fear would be wanting.

Doubtless something will there be arranged concerning the long-considered International Committee. It seems to us that the foundation of such an organisation is absolutely necessary for authoritatively incorporating additional words for the growing needs of a living language. Of course, only those roots already in the *Universala Vortaro* are the present fundamental roots of the language, and all other words found to be necessary have been introduced by various Esperantists. Even the creator of the language himself has given his sanction to these latter words, not as law-giver, but merely as the Esperantist most competent to make the selection.

We all, therefore, await with impatience the foundation of this central Committee. Naturally it must be *International*; but we fear that our distant readers in America, Africa, Asia and Australia will have to send their suggestions in writing, direct to Dr. Zamenhof for his consideration, in order that they may be submitted to the Boulogne Congress, which will probably include members from almost all European countries. But maybe the members of our latest Group, that in the Indian town of Udipi, will not be able to make their voices heard there with their almost as young Group-members in Folkestone.

The foundation of a Group in the latter town is most gratifying, and makes us think once more of the summer trip to the *Five Harbours*, which we have now in mind.

Captain Capé, who will, of course, be present, has just given the Esperantists a neatly got-up and good translation of *The First Chapter of my Reminiscences* (price 8d.), by François Coppée, the famous French author, who gives his warm approval to Esperanto. Also our well-known author, Sam Meyer, has just published in brochure form the humorous one-act comedy, "The Tureen" (16pp., 5d.).

But from Peru comes a most noteworthy technical book, *The Resistance of Iron Columns*, by Dr. Federico Villareal. It is a large 69-page work, in



Esperanta kaj Hispana, kiu nepre fortigas nian Sciencan Bibliotekon.

Profesoro Th. Cart, kies dika *Esperanta Ligilo* estas la Braille'a organo por la Blinduloj, ĵus verkis versan tradukon de *Trafendita Turo*, antikva Franca legendo. Tiu ŝatinda verketo eldoniĝas de la Esperanta Akcia Societo, de kiu multaj el niaj legantoj estas akciuloj.

Pro la ofta apero de Esperantaj verketoj, je kosto malpli ol 1 franko de privataj individuoj eldonataj, ni estos tre kontentaj se la verkistoj bonvolos sendi al ni dekon da ĉiuj tiaj eldonaĵoj kun fakturo. Ni plezure sendos la pagon aŭ per aliaj libroj (laŭ valoro) aŭ per poŝtmarkoj.

Oni altiras la atenton de ĉiuj Esperantistoj al la kvar paĝoj de nia kovrilo. Sur ili oni trovas utilajn informojn, kiuj plifaciligos Internacian Komercedon. Ni ja kredas ke, post kelkaj jaroj, estos tute ordinara afero sendi pencon aŭ du, al, eble, Germanujo, por tiuj beletaj pingloj, kiujn la Germanoj fabrikas pli bone ol ni, kompreneble, la Germanoj, siaflanke, senpene sendos al ni siajn malgrandajn mendojn por bunoj kaj diversaj kukaĵoj, kiujn ni faras tiom pli solidajn ol ili!

Anoncoj sur Esperantaj gazetoj devas alporti Internaciajn mendojn, kaj tuj kiam ni libere alprenas Esperanton por komercaj aferoj, ĉiuj komercistoj rapidegos ellerni la lingvon. Ni jam ricevis diversajn bonajn metiajn katalogojn kaj broŝurojn. Sed eble la letero de S<sup>ro</sup> Jadeau\* havos specialan intereson por la legantoj de THE ESPERANTIST, ĉar ĝi estis kiel respondo al Angla demandanto pri anonco sur nia kovrilo. Tiaj leteroj, kiaj estas tiu ĉi pruvas la valoron kaj taŭgecon de Esperanto komerce.

Diversaj korespondantoj skribis de tempo al tempo, proponante ke ni iom pritraktu tiujn gramatikajn punktojn kiuj ŝajne ne ricevis sufiĉan atenton sur niaj lernolibroj. Eble la nova verko de Dr. Lloyd klarigos tiajn. Sed, se ne, ni penados doni la necesan klarigon sur la THE ESPERANTIST.

Pri de D<sup>ro</sup> Lloyd, *The Esperanto Language Practically Considered and Described*, ni jam ricevis multajn aprobajn kritikojn, kaj unu fervora kunbatalanto eĉ verkis versaĵon pri ĝi, kiun ni presigas sube. †

En la fino de Januaro tre interesa parolado pri Esperanto paroliĝis de nia estimata kunverkanto, S<sup>ro</sup> Paul Mathews, M.A., ĉe la Pionira Klubo, kies Membrinoj interese aŭskultis, kaj varme aplaudis la parolinton.

Konkludante, ni rakontos kelkvorte la amuzilojn kiujn ni, Membroj de la Londona Klubo, alprenas ĉe niaj Lundaj Kunvenoj ĉe la Club Café, 5, Bishopsgate Street Within, E.C. Ni faras tion, opiniante ke la bona progreso jam farita inter niaj

Spanish and Esperanto, which undoubtedly strengthens our Scientific Library.

Professor Cart, whose bulky *Esperanta Ligilo* is the Braille organ for the Blind, has just composed a versified translation of *The Cleft Tower*, an ancient French legend. This pleasing work is published by the Esperanto Society, Ltd., of which many of our readers are shareholders.

Owing to the frequent appearance of Esperanto booklets, published at one shilling or less by private individuals, we shall be much obliged if the authors will kindly send ten each of all such publications to us, with an invoice. We will gladly remit either in other books (according to value) or in postage stamps.

The attention of all Esperantists is called to the four pages of our cover. On these is to be found useful information, which will facilitate International Commerce. We indeed believe that in a few years it will be quite a usual thing to send a penny or two, say to Germany, for those pretty pins, which the Germans make better than we; and, of course, Germans, on their part, will conveniently send us their small orders for buns and odd cakes, which we make so much more solid than they!

Announcements in Esperanto magazines must bring International orders, and as soon as we freely adopt Esperanto for commercial purposes, all merchants will hasten to master the language. We have already received several capital business catalogues and brochures. But perhaps M. Jadeau's letter\* will have a peculiar interest for readers of THE ESPERANTIST, as it was in reply to an English inquirer concerning an advertisement on our cover. Such letters as these prove the value and suitability of Esperanto commercially.

Several correspondents have written from time to time, proposing that we should touch upon grammatical points which had apparently not received adequate attention in our text-books. Probably Dr. Lloyd's new book will explain such. But, if not, we will endeavour to supply the necessary explanation in THE ESPERANTIST.

Regarding Dr. Lloyd's *The Esperanto Language Practically Considered and Described*, we have already received many most appreciative criticisms; and one devoted fellow worker has even composed verses, which we print below. †

At the close of January last a most interesting lecture on Esperanto was delivered by our esteemed contributor, Mr. Paul Mathews, M.A., at the Pioneer Club, the Members of which listened with interest, and warmly applauded the speaker.

In conclusion, we will relate in a few words the amusements which we Members of the London Club employ at our Monday meetings at the Club Café, 5, Bishopsgate Street Within, E.C. We do so believing that the good progress already made

adeptoj pruvas ke tiaj amuzoj provizas pli agrablan stud-manieron ol simpla (aŭ malsimpla) lerno-libro.

Komence, ni sekvas la Internacian kutimon manĝi iom, dume parolante aŭ Esperante aŭ Angle. Poste, je la sep kvin, ni transiras la straton en la ĉambrojn sindone pruntedonitaj al ni de la Remington Skrib-maŝina Kompanio. Tie ni sidigas en rondetojn, kaj partoprenas je diversaj ludoj. Ekzemple, unu rondero rakontos unu frazon, kiel la komenco de rakonto. Lia (aŭ ŝia) najbaro aldonos alian frazon, kaj tiel plu. La rezultato ja estas *miriga*, kaj ni ofte minacas doni unu el tiuj ĉi rakontoj al niaj legantoj! Poste, eble, unu ĉeestanto foriras dum ni elektas aferon pri kiu li devos demandadi, ĝis li eltrovos ĝin. Kompreneble, la demandoj kaj ĉiuj paroloj dum tiuj ĉi ludoj devas esti Esperante parolataj.

Alia tra ŝatata ludo estas "Mi enpakis en mian valizegon." En tiu ĉi okazo la unua rondero diras (eble) "*Ĉapelon*," lia najbaro devas ripeti *ĉapelon*, kaj (eble) *dent-purigilon*. Kaj la afero progresas, ĉiu persono devas ripeti ĉiujn la aferojn jam ŝovitajn en tiun misteran valizegon de liaj najbaroj, kaj ankaŭ aldoni pluan aferon, ĝis fine, oni ne plu povas memori la longan katalogon, kaj ĉagrene ekkrias: "Kaj la valizego pleniĝis!"

Sed la plej instruanta ludo estas: Sro A. eldiras Anglan frazon, kaj deziras ke alia membro ĝin traduku Esperante—bonega cerb-akrigilo tiu ĉi!

#### LA REDAKTORO.

\* ESTIMATA SINJORO.—Mi bone ricevis vian karton kaj mi rapidas por sendi al vi la demanditajn sciigojn. Plezure mi vendos detale miajn vinojn. Ĉu per kesteto enhavanta 12 botelojn, aŭ 24 duon-botelojn, ĉu per bareloj, ĉiu enhavanta de 55 ĝis 225 litrojn da blanka aŭ ruĝa vino.

La elspezoj pro la sendo kaj la imposto kunekun estas je:—

12 frankoj (9s. 8d.) por unu kesteto enhavanta 12 botelojn, aŭ 24 duon-botelojn da *ŝaŭmantaj* vinoj (ĉampana vino, k.t.p.).

9 frankoj (7s. 3d.) por unu kesteto enhavanta saman kvanton de *ne ŝaŭmantaj* vinoj, blankaj aŭ ruĝaj.

100 frankoj (£4) por unu barelo enhavanta 225 litrojn da blanka aŭ ruĝa vino.

Pro tiaj elspezoj kaj laŭ la kvalito, mi do povos sendi:—

Unu Kesteton da 12 boteloj po. 45 ĝis 60 frankoj (£1 16s. ĝis £2 8s.). Plie, por duon-boteloj 75 centimoj.

Unu Barelon da 55 litroj po. 110 frankoj (£4 8s.).

Ĉio afrankite de porto kaj de limpago en stacidomo de la adresato. Ĉiu detala sendo estas liverota por la pago.

Se vi povus sciigi al mi pri tio, mi tre deziras seriozajn makleristojn ĉe via lando por vendi detale miajn produktojn.

Estante preta por zorge plenumi viajn mendojn, mi prezentas al vi miajn plej korajn salutojn.—JADEAU.

† Vagonare vojaĝante  
(mi konfesos Esperante)  
Lernolibron mi maltegis  
Kaj ĝin tute mi tralegis.

Dum la longa vojaĝiro  
Jen per ravo, jen per miro  
Min profunde interesis  
Tiu libro kaj impresis.

"Kia estas la libreto  
De plezuro la fonteto?"  
Diru al la demandanto—  
"Pri la lingvo Esperanto.

"De Doktoro Lloyd verkita  
Kaj je penĉoj dek vendita.  
Kaj enhavas ĝi resumon  
Kiu disvastigas lumon.

"Sur sintakson, gramatikon,  
Kvankam ĝi ne havas dikon.  
Sed por Esperantistaro  
Estas multuminparvaro!"

D.H.L. (9660).

among our experts proves that such amusements provide a more agreeable form of study than a simple (or complicated) text-book.

To begin with, we adopt the International custom of having something to eat, chatting the while either in Esperanto or in English. Then, about 7h. 5m., we cross the road to the rooms kindly lent us by the Remington Typewriter Company. There we sit in circles and join in various games. For example, one member of the circle gives a sentence, as the beginning of a story. His (or her) neighbour adds another, and so on. The result is indeed *astounding*, and we often threaten to spring one of these stories on our readers! Then, perhaps, one present goes out while we select some object, about which he asks questions until he discovers it. Of course, the questions and all words in these games must be spoken in Esperanto.

Another greatly appreciated game is "I packed in my trunk." In this case the first member of the circle says, maybe, "A hat"; his neighbour has to repeat *a hat*, and adds (maybe) *a tooth-brush*. And the matter goes on, each person having to repeat all the things already stuffed into this mysterious trunk by his neighbours, and also to add something more, until, finally, one can no longer remember the long catalogue, and dolefully announces: "And the trunk was full!"

But the most instructive game is this: Mr A. pronounces an English phrase, and asks another member to translate it into Esperanto—a capital wit-sharpener.

THE EDITOR.

LA LEGENDO DE ANIMO FIDELA.  
De Adelaide Procter, tradukita de A. Motteau.

Katene ĝemas la spiritoj  
En purgatoriflamo :  
Foriĝas grade malmeritoj  
De pentoplena l' amo,  
Kredeble, kiu penis tere  
Por sin purigi vere.

Eĉ tie, ĉiu Marifesto  
Senpena tag' fariĝas,  
Kaj, dum benita tia resto,  
Espero kuragiĝas—  
Ĉar ĉiuj ĝuas l' interpacon,  
Dipatrinodonacon.

Sed, foje, en purgatorio,  
Eĉ sankta la reveno  
De la Nomfesto de Mario  
Ne ĉie iĝis beno—  
Ĉar spiritvoĉo tiel ĝemis  
Ke mil koreĥoj tremis !

Spirit'oj kune al Ĉielo  
*Te Deum* himnon sendis,  
Sed, Ĉefheroldo Miĥaelo  
Ĝin atdis kiu plendis :  
“ Vi, kial kantas ne dankeme ? ”  
Li diris kompateme.

Respondis la spirit' ĝemanta :  
“ Sendanka mi ne estas ;  
“ Sed kvankam paco viviganta  
“ Ĉi tie kun ni restas,  
“ Ĝi nek forpelas mian penon,  
“ Nek donas al mi benon.

“ Ĉar tere min aminta koro  
“ Bedaŭras nun kaj ploras,  
“ Kaj lian ŝarĝon de doloro  
“ Konstante mi memoras :  
“ Devenas mia la sufero  
“ El lia malespero.

“ Se estus eble por mi iri. . .  
“ Se vidi lin mi povus !  
“ Kor-amon mian eĉ rediri. . .

“ Li pli espere vivus !  
“ Pli pacience submetita,  
“ Li estus fortigita.”

Tuj diris nun la Ĉefangelo :  
“ Punlim' mallonga via  
“ Finiĝos baldaŭ : en Ĉielo  
“ Dolor' ne estas ia !  
“ Ĉu devus tera stato lia  
“ Pli pezi ol la via ?

“ Permeso iri via estu :  
“ Nur unu terminuton  
“ Konsolu lin : ne kune restu  
“ Pli ol la templimiton. . .  
“ Sed al vi kostos kora l' amo  
“ Miljaron da punflamo.”

Tilia ombro ŝirme falas  
Sur par' de gefianĉoj ;  
Karese ili kunparolas  
Sub la tremantaj branĉoj :  
Trankvila, dolĉa la vespero  
Invitas al l' espero. . .

Sed, jen ! nordvento akre blovas  
Tra la tiliarbejo. . .  
Ĝemego sin terure levas  
Ĝis la supernubejo,  
Lasante juna edzo vidva,  
Kun la edzin' senviva !

Ĉe l' pordo de l' purgatorio,  
Ĝis Miĥael' staranta,  
Atingis la terura krio  
De la spirit' iranta  
Por pagi koston de koramo :  
Miljaron da punflamo.

“ Anim' fidela, preteriru  
“ Kun la heroldo dia ;  
“ En paradizon tuj eniru,  
“ Pro l' amo granda via :  
“ Dum minut-agonia faro  
“ Pasiĝis la miljaro.”

Al floro papilio flugis, la folietojn ŝiris,  
Suĉante tie unufoje, kaj tiam supreniris.  
Lacerto el murtruo venis ; pri io ĝi sopiris,  
Sed nur rigardis unufoje, kaj tiam reeniris.  
Sinjor' fraŭlinon belan vidis ; li multe ŝin admiris,  
Sed nur parolis unufoje, kaj tiam tuj foriris.  
Ne estis en la flor' mielo ; Nek suno en ĉielo ;  
Sen mono estis la angelo ; Ho ! kia ver-fabelo !

(CLARENCE BICKNELL).

## KIAM EKFLORADAS REZEDOJ.

Pentraĵeto el Rusa Litvujo.

Originale en Esperanto, verkita de Osip Ivanoviĉ Elleder.

Pli kaj pli pala, senkolora ekmontris la ĉirkaŭaĵo. La lastaj birdoj estis nin forlasintaj, akraj nordorientaj ventoj peladis nun senhalte super la vastaj Litovaj ebenaĵoj, kiel tranĉiloj penetrigante la felvestojn de homoj. En rigida mallafiteco staris nun la nuda arbetaro sur Ŝeŝupo-deklivaĵoj, nur kiam la vento enturniĝis, freneze sekigitajn foliojn rondigante, eksonis de tie kiel siblado de ekkolerintaj serpentoj.

Mallumajn, grizajn nubojn respeguligantaj akvoj de Ŝeŝupo fariĝis nun malhelaj, netravideblaj; ilia murmurado ŝajnis esti esprimo de ĉagreno kaj plendo kaj ili fluis pli rapide kvazaŭ dezirante forkuri de proksimiĝanta severa vintro. Ĉio aperis malplena, forlasita, malgaja.

De granda ŝtono forblovis la ventego ĉiujn somerajn memorarojn. Ĝi forblovis florojn tie disĵetitajn, forblovis rezedbukedojn velkigantajn; forblovis ankaŭ la noktan kantistinon.

Ŝi nun sidis alligita al multepeza ligna benko en malĝoja ĉambreto, tra kies etaj fenestretoj estis partoj de ĉirkaŭaĵo videblaj. Sopire eraris ŝiaj rigardoj tien, kie la konturoj de altaj riverbordoĵ desegniĝis de griza firmamento.

Ho, tie plaŭdetis la ondoj de Ŝeŝupa rivero, tie levigadis ĝiaj bordoĵ . . . ho, tien tien !!

La benko kraketis, la ŝnuroj tranĉis sangruĝajn striojn en nudaj brakoj, sed la katenoj tenis fortike; sovaĝe rigardis la knabino apud si. . . .

Jen subite, tra grizaj aŭtunaj nuboj, kiel por adiaŭigo trarigardis la subiranta suno, origante la tutan ĉirkaŭaĵon. Ĝia radio eniris eĉ en la malhelan ĉambretan eklumigante tie la lignan krucifikseton starantan apud nigra preĝlibro sur la fenestra tabuleto, ĝi ekheligis malmultan, malriĉan meblaron kaj kisis kareseme la palan vizago de en vana penado turmentiganta knabino. La pensoj de la kompatindulino denove vagis eksteren: tie en la pura aero ekbrilis ŝia sidejo, muskovrita, alta ŝtono, tie la sama suno kiu nun sendis sian lastan saluton al ŝi, kisdas ŝian vizago kiam frumatene la dolĉaj kantoj de birdaroj vekigadis la junan tagon kaj sur la herbejo ekbrilis miliardoj da diamantoj. Tie la sama suno kisdas ŝin adiaŭigante vespere kiam la ondoj dormeme murmuradis, kaj la najtingaloj kantis, kaj nun alligita en surda putra ĉambro ŝi ne povas kun-kanti!

La benko kraketis, la ŝnuroj entrancis en la blanka korpo, ruĝa sango gutis sur la tero. . . Vana penado!

Malrapidante estingiĝis la ora radio kaj iom post iom ekpaliĝis la lasta rebrilo de jam malaperiginta suno. Malhele, funebre fariĝis ree en la malgranda ĉambreto.

Kaj ekstere murmuris ĉagrene la Ŝeŝupo-ondoj pli rapide portante siajn akvojn al la maro.

La frenezulino serioze ekmalsaniĝis. Ŝi, kiu tage kaj nokte sen malutiligo elportadis ĉiujn veterŝanĝojn ekmalsaniĝis en varma ĉambro. Ŝia farto jam ekmontris senespera kiam Leonid Leonidoviĉ eksciis pri ĝi.

En nia lando loĝadas kuracistoj nur en malproksimaj urboj, tamen mia amiko veturis tuj urbon kaj revenis kun kuracisto kiu difinis seriozan pulmobrilemon.

Daŭris multajn semajnojn, kaj kelkfoje devis ankoraŭ veni la kuracisto ĝis la knabino resaniĝis, ĉar al la brulemo aligiĝis infektama, longedaŭra malsano. Sen helpo de Leonid Leonidoviĉ, kiu tre ofte mem venadis por vidi la malsanulinon, kaj observi ŝian flegadon, kiu ankaŭ pagis ĉiujn elspezojn, ŝi certe estus mortinta. Ŝiaj parencoj estis tre malriĉaj kaj ili havis ankaŭ nur malmulte da intereso pri la vivo de la kompatinda orfino.

Kvankam ĉiam ŝia spirita stato en la vintro pliboniĝadis, estis do tre rimarkinde ke ŝi post ŝia malsaneco, kiam ŝi reakiris fortojn, fariĝis preskaŭ tute prudenta. Ŝi ekkonis mian amikon kiel ŝia bonfaranto kaj kisis unu tagon el propra volo liajn manojn. Ŝiaj parencoj kaj najbaraj vilaĝanoj opiniis ke la grava malsano liberigis ŝin de frenezeco, kaj kredis ke ŝi restos nun por ĉiam prudenta. Tio komence ankaŭ ŝajnis efektiviĝi. Sed ju pli proksimiĝis la printempo, des pli timetema, malparolema ŝi fariĝis, des pli ofte eraris ŝiaj rigardoj en la bluan malproksimecon kaj ankoraŭ kuŝis multaj blankaj neĝstrioj sur nigriĝantaj kamparoj, kiam ŝi unu belan tagon estis malaperinta.

Saman tagon revenis alaŭdoj Litvalandon.

\* \* \* \* \*

Pasante iam vespere apud granda ŝtono mi ekaŭdis subite la voĉon de Leonid Leonidoviĉ. Ĝi sonis tute proksime kvankam mi la parolanton pro densaj arbetoj ne povis vidi. Tute klare mi aŭdis lian parolon:

“ . . . foriris la tago por dormi, la horo de revido proksimiĝas. Rozkoloro flamas la okcidento, kaj baldaŭ ampleksos ĉion intima krepusko, ŝirmantolino de geamantoj kaj tiam aperos ankaŭ ci, amatulino. Ci venos, ci ja ne povas forlasi min ĉar ci konas mian senliman amon, mian sopiron. Ci venos! El blua alteco ci malsupreniros pura kaj bela kiel ĉielaj anĝeloj, por atesti ke ci min amas, ke ci restadas la mia, la mia por la eterneco.

Ili diris ke ci ĉesis ami min, ne sciantuloj! ili ne scias, ke tio estas ne eble. Ili parolas tiel, ĉar ili ne konas cin. Erariĝintoj! kiun cia koro ekamis, tiun ĝi amos ĝis sia lasta bato. Neŝangebla estas cia amo, ĉar ci estas sanktulino.

Ili diris ke ci estas mortinta. Ne eble! tiam ja ankaŭ mi ne vivus plu—aŭ mia amo estus el la tombo vekinta cin. Nin ja nenio povas disigi, ĉar niaj animoj estas kunigitaj kaj apartenas unu por la alia—por la eterneco!

Ho! Ci aŭdis mian alvokon, ci aperas . . . dankojn, dankojn, ora, ora stelo mia!”

En tiu ĉi momento mi ekrigardis mian amikon, kiel li, starante sube ĉe la rivero, eketendis siajn brakojn alten je la klara nokta ĉielo, kie ĵus ekbriletis radiantaj steloj.

En la arbeto kantis dolĉe la najtingalo, kareseme ventumis la printempa mola aero, kaj de alta ŝtono eksonis nun la plendo de la freneza knabino:

“*kass man' iĵ vardalo ir iĵ pravardelo.*”

Mediteme mi revenis hejmen. Kiela stranga afero estas do la homa koro, pensis mi, dume la dormo longe evitis miajn okulojn.

\* \* \* \*

La rezedoj en mia ĝardeno estis ree ekflorantaj. Ilia raviganta aromo estis la dolĉa saluto de veninta somero. Varmega estis la vetero. Jam de kelkaj semajnoj radiis arda suno de sennuba ĉielo sur la elsekiĝinta, soifanta tero. Per videblaj ondetoj tremetis la aero, velkigante pendigis la kamp-floretoj siajn kapetojn malsupren, kaj sub ombro de branĉoj kun vaste malfermitaj bekoj, malvigle sidis la korvoj.

Unu tielan ardan tagon, en malfrua postmezataghoro mi foriris por ĉasi anasidojn en densajn kanarojn de Ŝeŝupo. Mi ne scias kio tiun tagon estis kaŭzinta mian fortan, internan maltrankvilecon; estis miaj nervoj per longedaŭra turmentiganta varmegeco tro ekscitigitaj aŭ estis io alia, sufiĉe, mi sentis strangan, neklarigeblan timon kaj maltrankvilon, kvazaŭ mi antaŭsentus, ke io okazos.

Enfervoriginta en sukcesa ĉaso mi tute ne rimarkis, ke jam vespero alproksimiĝis, kaj ke mallumaj nuboj, el sudo levigintaj, komencis kovrigi ĉielon. Malproksima rulado de tondro

nur rememorigis min ke estas tempo pensi pri la reveno. Mi alfajfis mian hundon kaj rapidis direkti miajn paŝojn hejmen.

Dume, ĉiam pli dense kovris nigraj nuboj la firmamenton, ĉiam pli akraj fulmoj eklumigadis ĉielon, kaj la tondro eksonis pli laŭte, pli forte. Mi rapidegis atingi proksiman altan bordon, apud granda ŝtono, kie mi povis almenaŭ iom ŝirmi min de malbona vetero.

Jam en interrompoj ekbruis la unuaj ventpuŝoj, kaj grandaj gutoj falis multepeze sur la teron, kiam mi alvenis tien. Firme apoginte min al la krutaĵo, mi decidis atendi la preteriron de la fulmatondro.

Subite la vento eksilentigis, pluvo ĉesis, kaj plenege senmoveco aperis: nek la plej malgranda trunketo moviĝis, nek ia folieto tremetis, ĉio staris rigide, senmove kiel ekŝtonigite, kvazaŭ la tuta naturo pro ekterurigo kaj timo ne kuraĝis eĉ spiradi. Nur sur la firmamento ŝoviĝis nigraj, masaj nubegoj, kiel minacaj gigantuloj, fantomsimile antaŭen. Tiu ĉi momenta senmoveco estis pli timiganta ol la antaŭa bruado kaj moviĝo. Instinkte oni sentis, ke la eksplodo nun estas proksimega, neevitebla.

Jen kelkaj blankaj, zigzagaj fulmoj kaj akraj tondro-batoj donis signalon, kaj la fulmatondro kun tuta potenco kaj forto nun eksplodegis.

Estis terure grandioza naturmontraĵo. Surda bruado eksonis en la aero, la mallumeco fariĝis plenege, nur por sekundoj per blanka aŭ verda lumo ekheligadis, fulmoj la ĉirkaŭaĵon, igante postan mallumon ankoraŭ pli nigran. La ventego furioze kriegis, arboj bruis, kaj nuboj, malfermigante siajn kluzojn, verŝis muĝante siajn akvojn sur la teron. Bato post bato sekvis, la ĉielo ŝajnis unu fajra maro.

Sur la dekstra flanko, proksime de mia kaŝejo, troviĝis la granda ŝtono. En la flagranta lumo de fulmoj mi por momentoj vidis ĝin, kiel magia, nigra, alta turo preskaŭ vertikale super la rivero sin leviganta. Siblado, fajfado, bruego, igis inferan muzikadon. En ŝaŭmantaj kaskadoj jetiĝis de la krutaĵo muĝantaj riveroj malsupren. La tero kun nuboj miksiĝis, ŝajnis ke la naturo ellasis ĉiujn terurojn en ĉi tiu batalo de elementoj.

Mia kaŝejo, kiu nur mizere min ŝirmis, komencis fariĝi tre maloportuna tamen mi ne povis forlasi ĝin.

Jen la akrega, blindiganta fulmo, super mia kapo la terurega, krakadanta tondro, laŭtega, kordisŝiranta ekkrio, kaj en rebrilo de tuj sekvinta fulmo mi ekvidis nigran virinan figuron kun vaste svingitaj brakoj falegantaj, la kapon malsupren, de la pinto de alta ŝtono en la riveron.

Nek falegon en la ondojn, nek ceterajn kriojn, nenion plu mi aŭdis, la bruo de la vetero super-

surdigis ĉion. Mi eksaltis el mia kaŝejo ekkurante al la riverbordon. Sed tio ne estis facile. Mallume, ekscitiĝo, densa arbetaro, branĉoj kaj radikoj, akvaroj fluantaj, malhelpis ĉiun paŝon. Mi glitis, mi falis, mi rampis, kaj alveninte fine al la rivero mi nek aŭdis, nek vidis ion, tial post mallonga tempo, ekkoninte mian plenan senpovon por ia helpo, mi rapidegis atingi la plej proksiman kolonion.

Tie alvokinte homojn, ni kun stangoj kaj fajrhokoj reiris al la rivero. La vetero estis dume kvietiginta sed pro la densega salik-arbetaro sur la bordo elkreskita, fariĝis nia laboro tre malfacila. La mallonga somera nokto pasis en sensukcesa serĉado, nur sub la granda ŝtono ĉe la riverbordo ni trovis ĉapelon kaj surtuton de Leonid Leonidoviĉ.

Tagiĝis, kiam, tenatan de salikradikoj ni eltiris el la rivero la korpon de malfeliĉa knabino kaj kune, firme ĉirkaŭprenita de ŝiaj brakoj—la korpon de mia amiko.

Ambaŭ mortintaj, droniĝintaj.

\* \* \* \*

Estis klare: la kompatindulino ekterurigiĝinta aŭ konfuziĝinta pro proksimega enbatiĝo de fulmo, abismigiĝis suben de sia alta sidejo.—Leonid Leonidoviĉ surpriziĝinta dum sia vesperpromenado de la fulmatondro kaŝiĝis ankaŭ ĉe la granda ŝtono, sed aliflanke kaj apud la riverbordo, kie mi ne povis

vidi lin.—Kiam li rimarkis falintan en la Ŝcaŭpon knabinon, li, estinte bona naĝanto, forĵetis sian ĉapelon kaj surtuton kaj ensaltis en la riveron por savi ŝin. Sed estis alie difinita. Okulvideble la knabino kuu timiĝo de ekdroniĝanto firme ĉirkaŭprenis lin, kaj sin alkroĉinte je li estis la kaŭzo, ke li ne povis naĝi. Tiamaniere ili ambaŭ trovis en la terura nokto sian pereon. . . . \*

Klare radiante levigis sur sennuba lazura firmamento la suno promesante belegan someran tagon.

Sur verda herbaro paceme kuŝis mia amiko kaj apud li, inter malsekigitaj floroj, la nokta, nun muta kantistino de la granda ŝtono.

En la branĉaro de kviete moviĝantaj bordsalikoj ludis junaj sunradioj.—Sur la nudigita brusto de Leonid Leonidoviĉ mi rimarkis oran medalioneton. Demetigante ĝin mi trovis en ĝi bukleton de molaj, brunaj haroj. . . . En la matensuno ekbriletis ili en oraj nuancoj.

Mi remetis la medalionon, alfortiginte ĉirkaŭ la kolo de la mortinto la ligilon. Super la vizago de mia amiko flugetis ĵus la sunradio—kiel lasta feliĉa rideto. . . .

Ĉiujare, kiam la bonodoro de rezedoj dolĉigadas la aeron en mia ĝardeno, mi devas pensi pri mia mortinta amiko Leonid Leonidoviĉ.

## PRI INFANOJ, KIUJN MI KONAS.

Originale verkita de E.W.

(i.). Knabineto de tri jaroj kaj unu monato parolis tre rapide kaj tiel malklare, ke amikino diris al ŝi: "Volu paroli pli bone, estas neeble kompreni tion, kion vi volas diri."

Kun kompatinda rideto la infanino respondis: "Mi ja bone parolis; vi tute ne komprenis, ĉar mi parolas France," kaj ŝi gaje ridis pro sia ŝerceto.

(ii.). Antaŭ du aŭ tri jaroj, avino legis al kvin-jara knabo. Tiu ĉi havis apude lud-pafilon kaj kelkafoje li ekkriis: "Haltu, avinjo, mi vidas Boeron, mi devas pafi lin," kaj li pafis.

Poste li diris: "Mi mortigis lin, legadu do nun."

Enfine la avino demandis lin: "Ĉu vi ne bedaŭras pro knabinetoj Boeraj, kiam vi mortigis iliajn patrojn?"

Unu minuton li silentis, tiam li decide respondis: "Ne, avinjo, ĉar estas tute neniam geknaboj. La Boeraj estas saĝuloj; ili sciis, ke estos militado, tial ili preĝis: "Kompleze

Dio, ni tute ne volas naskigi infanojn. Ili estas tre piaj homoj, kaj do Dio aŭdas iliajn preĝojn, kaj certe ne estas infanoj Boeraj."

La avino tiam lin demandis: "Ĉu vi ne kompatas la avinojn Boerajn? Pensu nur kiel mi ploregus, se mi perdus vian patron. Sendube ili amas siajn filojn, tiom, kiom mi amas mian. Ĉu vi ne ilin kompatas?"

La knabo deturnis la kapon dirante: "Mi pensas, avinjo, ke estos pli bone, ke vi legadu."

(iii.). Vidvo, kiu kore penadis fari ĝuste tion, kio plaĉus al lia estinta edzino, aŭdis la vesperan preĝon de ŝia sesjara nevino. Tiu ĉi, subite levigante, diris: "Mi nur volas ke miaj preĝoj vivus."

"Ke ili vivus? karega infano," ripetis la pia maljunulo, kiu atendis aŭdi en respondo kelkajn parolojn de fido aŭ de ama deziro, "ke ili vivus: kion vi volas diri?"

"Mi volas diri, ke mi estus feliĉa se miaj preĝoj estus vivantaj, kiel hundoj kaj katoj, por

ke mi povu ilin bati, pinĉi, kaj piedfrapi—tiom mi ilin malamegas. Ĉiam estas preĝoj matene kaj vespere, tamen ne estas unu malpura ĉifonata bubetino sur la stratoj tiel malbona kiel mi!”

Ŝi parolis kun flamruĝaj vangoj, okuloj ekbrilantaj, kaj piedoj, kiuj perforte frapadis la teron.

Larmoj fluis supre la grizaj lipharoj de la maljuna militisto.

(iv.). Du fratoj, el kiuj Tomo estas pli juna de du jaroj ol Fredo, tre ŝatis ludi ĉe la fajro, kaj ofte faris malbonaĵojn. La pliaĝa sole puniĝis. Al mi tio malplaĉis, ĉar mi volis puni ankaŭ Tomon, hontigante lin.

Mi diris do: “Vi estas tiel malbona kiel Fredo; vi devas ĉiam lin devigi ne tuŝi la fajron.”

“Kiamaniere mi povos lin devigi?”

“Diru al li: ‘Mi vokos Anjon (la vartistinon),’ kaj, se li persistos, alvoku ŝin.”

Li promesis tiel agi.

Post kelkaj tagoj, laodoro de brulanta ligno nin rapidigis al unu ĉambro. La du knaboj ĝojis, ili lumigis fajron sur la planko, sub lito. Fredo puniĝis, sed ne Tomo.

Tiu ĉi rigardis min dube, kaj diris “Estas tute la kulpo de Fredo, li volis ĝin fari!”

“Ĉu vi alvokis Anjon?”

“Ne, estas la kulpo de Fredo, li min ne memorigis alvoki Anjon!”

(v.). Nove naskito kuŝis sur la brakoj de sia patrino kaj faris bruetojn, kiel faras la infanetoj, kiam ili estas feliĉaj.

Ĝia kvarjara frato venis, dirante: “Panjo mia, tiu ĉi estas malbona infaneto, ĉar ĝi parolas Telegue. Mi parolas Angle, mi ne komprenas la lingvon, kiun parolas la infaneto, ĉar ĝi estas tre malpura Teleguo.”

(En la parto Hindujo, kie oni parolas *Telegue*, la servistoj estis tre maldelikataj, tial ke la Angloj ne volis, ke siaj infanoj lernus ilian lingvon.)

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

Eble la transiro de la farmamastro al la vojoj de la regiono estas natura, sed se ne, memoru, mi petas, ke mi ne promesis ordigi miajn pensojn. Kontraŭe mi diris ke mi ĉiam prenos la penson, kiu plej altiras min ĉe la momento. Mi nun pensas pri la vojoj. Tial mi parolos pri la vojoj.

Ofte mi akompanadis dum liaj veturoj la kuraciston, kiu havas tre bonan ĉevalon kaj estas tre lerta veturiganto.

Lia veturilo, el speco kiun on la Ŝtatoj oni nomas *Buggy* estas tre malpeza sed treege forta. Ĝi havis du altegajn radojn, kaj povadis enhavi nur du personojn. Alian veturilon mi ofte vidis, kiu povadis enhavi nur unu personon. Tiajn veturilojn oni nomas *Sulky* (kolereta), ĉar, oni diras, ili tre konvenas por koloretulo.

Forveturante mi ĉiam tre miris ĉu ni revenos sen kelka malfeliĉa okazintaĵo. Foje kiam ni estis nokte veturintaj kune tra la mallumo, mi iris piede la morgaŭan tagon por rigardi la vojon. Kiam mi ĝin vidis mi apenaŭ povis kredi, ke mi ankoraŭ vivas. Tamen ni estis trotantaj tre rapide kaj la ĉevalo eĉ ne faletis.

Ie mi legis pri maristo de kiu oni demandis priskribon pri la manieroj kaj kutimoj de sovaĝa gento, kiun, dum siaj marvojaĝoj, li vizitis. Li skribis nur kvar vortojn:—*Manieroj, neniom; kutimoj, malagrablaj.*

Oni ankaŭ rakontas ke la fama Irlanda parolisto *Sir Boyle Roche* foje diris pri kelkaj parlamentanoj, ke ili estas “Videgeblaj pro sia forestado.”

Kiam mi pensas pri la vojoj de tiu regiono, mi ankaŭ pensas pri la du supreskribitaj rakontetoj.

Certe la urbanoj ofte parolis pri siaj “vojoj.” Ili eĉ estis fieraj pri ili. Tamen ili ne ĉie estas formovintaj la radikojn de la arboj, kiujn ili antaŭe dehakis, kaj foje la tuta malsupraĵo de la arbtrunko ankoraŭ restas sur la vojo mem. Ĉiujn tiajn kontraŭaĵojn la *Buggy* superek saltis, kaj se en tiaj okazoj mi ne falis sur la kuraciston, tio okazis pro tio, ke li estas falinta sur min.

Sed oni devas memori ke, por fari longajn vojaĝojn, la Amerikanoj ĉiam veturas per vagonaro. Tial ili ne tre bezonas en la kamparo bonajn vojojn. Se en Eŭropo ni estus ricevintaj la fervojojn antaŭ ricevi la vojojn por veturiloj, eble ni ne havus tiujn lastajn tiel bonajn kiel ni nun posedas ilin. Multon ni ŝuldas al niaj praaŭvoj kiuj veturadis per publikaj veturiloj (stage coaches).

Oni ankaŭ devas memori, ke kuracistoj vizitas tre senhomajn lokojn. Unu el tiaj vizitoj revenas en mian memoron; vizito kiun ni faris al Franca familio, kies kelkaj el la infanoj estas malsanaj. Ili loĝadis tute en la kamparo, kaj, estantaj novaj enmigrintoj, ne ankoraŭ parolas la lingvon

Amerikan. (Mi diras *Amerikan*, ĉar ĝi tre diferencas de la Angla lingvo, de kiu ĝi estas filo).

Mia kunulo petis, ke mi eniru kun li por traduki.

“Sed la ĉevalo,” mi diris, “ĉu ĝi restos senmove!”

“Ho, jes. Mi montras al vi la Amerikan manieron dresi ĉevalojn. Li tre bone restos.”

Kaj preninte la kondukilon li ĝin alligas al la antaŭa parto de unu el la grandegaj radoj, tiamaniere ke ĝi estu iom prema.

“Nun,” li diris, “se la ĉevalo antaŭeniros, la rado per sia turniĝo tiros la kondukilon, kaj se li tamen persistus (kion li ne faros) ĝi certe rompus al li la makzelon. Se li ŝanĝos la movon kaj iros malantaŭen, ankoraŭ la rado turniĝante tiros la kondukilon. Pro tio li ne forkuros? Ĉu vi ne tiel dresas en Anglujo la ĉevalojn?”

“Ho, ne,” mi respondis ridetante. “Niaj Anglaj vojoj ne estas sufiĉe larĝaj por tiamaniere haltigi ĉevalojn. Tie ĉi mi certe ne plendas pri la mallarĝeco de la vojo. Ne, mia malfacilaĵo estas ke mi tute ne povas ie eltrovi vojon.”

“Ho,” li respondis, “la tuta plataĵo estas nia vojo. Ĉu vi deziras unu pli bonan aŭ pli belan?”

Mi ĉirkaŭrigardis sur la verdan plataĵon kaj respondis, “Ne”; tiam kiel posta prepenco mi aldonis, “Almenaŭ ne dum daŭros la bela vetero.”

\* \* \* \*

Dum unu el niaj multaj veturadoj, ni estis alvenintaj al la ligna ponto per kiu la vojo trapasas la *Creek*-on.

Mi vidis multajn tiajn pontojn! Jen la maniero konstruigi ilin:—

Trans la *Creek*-o oni metas du aŭ tri dikajn trabojn kiujn oni enfiksas en la du bordojn.

Al la traboj oni alfiksas transe tabulojn. Sur la tabulojn, kiuj ofte suprensaltas sub la radoj de surpasanta veturilo, oni metas maldikan tertavolon, kaj jen la ponto.

Barilojn ĝi tute ne havas, tial kompreneble oni povas tre facile enveturi de ĝi en la rivereton.

Sed malgraŭ la proksimeco de tia belega (!) ponto la kuracisto insistis traveturi la akvon.

“Tio,” li diris, “ne sole malvarmigis la hufojn de la ĉevalo; ĝi ankaŭ iom purigos la radojn de la *Buggy*. Jen du dezirindaĵoj.”

Tiajn saĝajn parolojn mi ne povis kontraŭdiri. Ni enveturis la *Krikon*.

Mi skribis supre, ke la radoj de la *Buggy* estas altegaj. Mi skribos tie ĉi, ke la kuŝejo de la *Kriko* estis profunda. Pli kaj pli la akvo supreniris ĝis fine ĝi eniris eĉ en la veturilon mem. Sentante subitan malsekiĝon ĉe la piedoj mi malsuprenrigardis. Ili estis en la akvo.

“Kion mi devas nun fari?” mi demandis.

Kaj trankvila voĉo respondis:—“Ho, metu viajn piedojn sur la spruĉ-ŝirmilon.” Kaj alligante al la precepto la ekzemplon, la kuracisto levigis siajn kruojn al la nomita loko. Tion saman mi ankaŭ faris kaj kun niaj kvar piedoj olstreĉitaj rekte antaŭ ni, ni daŭrigis la traveturon. La akvo ankaŭ daŭrigis sian supreniron, sed antaŭ ĝi atingis la seĝon de la *Buggy* ni trapasis la plej profundan parton de la rivereto.

Fine ni alvenis al la alia bordo kiu, laŭ sia kruteco, tre similis al domtegmento.

Mi certe estus preferinta suprenrampi per miaj propraj kruoj sed mia kunulo deziris, ke mi vidos kiamaniere Amerika ĉevalo povas suprenrampi riverbordon.

Ĉu iu el miaj legantoj iam sidis ĝuste malsupre sub (aŭ ĉu mi diros post; estas malfacile diri en kia pozicio):—Ĉu iu el miaj legantoj iam sidis malsupre sub forte suprenrampanta ĉevalo, kaj rimarkis kiamaniere ĝi streĉas kaj ŝvoligas ĉiun el siaj grandaj muskoloj?

Ĉu li rigardis supren kaj vidis nur la bluan ĉielon, la supron de la bordo, suprependantan arbon, kaj la fortikan korpon de la besto?

Ĉu li entenis la spiradon kiam ĝi faletis, glitis, kaj li sentis malantaŭen rulon de la radoj (kiu tamen ŝajnas al li veran ruladon, tiel longe la sekundoj daŭras); kaj fine elspiras elspiraĵon de kontentigo kiam li trovas sin ankoraŭ en la akvo de la *Kriko*?

Ĉu li vidis la ĉevalon kun mieno honta komenci denove la saman supreniradon? Ĉu li kurbis sin antaŭen por ĝin helpi? Ĉu li vidis kiam per granda peno ĝi atingis per la antaŭaj hufoj la supraĵon, dum ankoraŭ la malantaŭaj faletas kaj glitas sur la kruta kaj mola deklivo?

Ĉu li sentis la ekskuon kun kiu la veturilo fine supreneksaltis; entiris en siajn pulmojn longan spiradon kaj ĉirkaŭrigardis la ebenan plataĵon tiel, kiel se li estus revidanta longe perditan amikon.

Se jes, li komprenos mian priskribon, kaj li ankaŭ atestos, ke en tia okazo, la suprenrampado de ĉevalo ne estas malsimila al tiu de grandega hundo.

Tion mi iom longe priskribis pro kaŭzo ke ĝi tre bone montras la fortecon kaj malpezeccon de la veturilo kiun la Amerikanoj nomas *Buggy*.

En alia veturado kun alia veturiganto kaj en alia regiono la *Buggy* en kiu mi veturis enfosiĝis ĝis la akso en sablon.

Mia kunulo neniel maltrankviliĝis kaj la malpezega kaj fortega *Buggy* facile trapasis la sablan kontraŭaĵon.

Sed mi estas jam skribinta sufiĉon por montri, ke miaj veturadoj ne estis tute sen intereso.



## KUKAJETOJ ANGLA, SKOTA AND IRLANDA.

Originale verkitaj por la Kvina Hora Mango, de Jem Ross Archibald.

ANGLA. *Materialo* :—

- $\frac{3}{4}$  funto da faruno (kribrita kun 1 teokulero da kuir-pudro).  
 $\frac{1}{4}$  da sukero (kribrita).  
 $\frac{1}{4}$  da butero, tri ovoj, teotaso da lakto.

*Metodo*.—Frotu, per la fingroj trae, la sukeron, buteron kaj la kribritan farunon kaj kuir pudron. En aparta pelvo batu la ovojn ĝis malpezaj, poste aldonu la lakton. Nun, per ligna kulero agitu rapide la tutan miksaĵon. Duone plenigu kolkajn buteritajn kukaĵet-stanaĵojn. Baku en varmega forno ĉirkaŭ 15 minutojn.

Kiam malvarmaj, ili estas pretaj.

SKOTA. *Materialo* :—

- 1 funto da butero.  
 $1\frac{3}{4}$  da faruno (kribrita).  
 $\frac{1}{4}$  da faruno riza.  
 $\frac{1}{2}$  da sukero (kribrita).

*Metodo*.—Metu la buteron en pelvegion kaj, per la mano, farigu ĝin krema. Nun aldonu la sukeron kaj kunmiksiu trae. Poste (sed nur iom post iom) aldonu la du specojn da faruno, miksu ĝis ĝi fariĝas ebena elasta knedaĵo. Elrulu la knedaĵon per ligna rulilo ĝis ĝi fariĝas nur ĉirkaŭ duon-colo dike (1.5 cm). Formu ĝin en rondetoj, levigu ĉiun tre zorge, kaj metu ĉiun sur aparta buterita papero. Poste, por ornamo la kukaĵetojn, piku la

supraĵon meze per forko, kaj per la montra fingro kaj dika fingro pinĉu en punktoj la randon. La forno ne devas esti tre rapida, baku ĉirkaŭ 20 aŭ 25 minutojn. Dum varmaj, tiuj ĉi kukaĵoj estas tre facile rompeblaj. Lasu ilin ĝis malvarmaj sur la paperoj. Poste enmetu en biskvitujon, ĉar, en la aero, ili baldaŭ moligas.

IRLANDA. *Materialo* :—

- $\frac{3}{4}$  funto da faruno riza (kribrita).  
 $\frac{1}{4}$  da sukero (kribrita).  
 $\frac{1}{2}$  da butero.  
 $\frac{1}{4}$  da migdaloj (ŝelitaj per bolanta akvo kaj dishaketitaj).  
 9 ovoj, batitaj ĝis ŝaumaj.  
 Unu teokulero da citron-suko.  
 Unu teokulero da Karavaj semoj.  
 Unu teotaso da rozo-akvo.

*Metodo*.—Batu la buteron per ligna kulero ĝis krema. Iom post iom aldonu la sukeron kaj la rozo-akvon, batu ĝis trae miksitaj. Aldonu la ŝaumigitajn ovojn, agitu rapide per ligna kulero, kaj aldonu iom post iom la riz-farunon jam kribritan. Nun aldonu la migdalojn, la semojn, kaj la sukron. Verŝu la miksaĵon en kukaĵ-ingon (stanan) jam pretigita per buterita papera substofa. Baku en rapida forno dum ĉirkaŭ 90 minutoj.

## EL PUŜKIN.

## EL LERMONTEV.

Tradukitaj de A. Nippa (Ivanino).

En la kampo vasta, pura  
 Brilas neĝo ondigita,  
 Lumas luno trojko<sup>1</sup> kuras  
 Sur la neĝo trabatita.  
 Kantu vi! kaj mi silenta  
 Aŭdos nun avide kanton—  
 Bruas la malgaja vento,  
 Kaj malvarma lun' lumanta.  
 Kantu vi: en nokt' malgaja,  
 Sur la vojo, al la koro,  
 Estas dolĉaj sonoj gajaj  
 De la kanto belsonora.

Nokte staris la nubet' dormanta  
 Ĉe la brusto de ŝtoneg' grandega,  
 Kaj matene vojon venis ĝi fruege,  
 Sur bluaĵo gaje ludigante.

Sed malseka signo postrestadis  
 En la sulkoj de ŝtoneg' staranta.  
 Sola staras li, profunde pripensanta,  
 Kaj mallalite en dezert' ploradis.

<sup>1</sup> Tri-ĉevala glit-veturilo.

## LA LEGENDO PRI LA UNUA VIOLONO.

El la Franca de Jean & Jerome Tharaud, tradukita de F. L. G. Marechal.

Macha rapide ekkaptis la spegulon kaj forkuris. Ŝi kuris ĝis la kajuto, kiu estis senhoma. Ŝi eltiris la spegulon el sia peltó kaj rave rigardis ĝin. Ĝi estis simpla ornamaĵo, nur ovforma spegulo ornamita per opaloj. Ŝi ne laciĝis rigardi sin sur la spegulo, kiu redonis ŝian vizaĝon kaj grandajn blujajn okulojn kiel la limpida akvo el la fontoj.

La proksiman tagon ŝi atendis apud la ponto de la kastelo, kaj vespere, kiam la kavaliro revenis hejmen sole, ĉar, pro la rapideco de lia ĉevalo, li postlasis siajn servistojn, li vidis Machan eliri el la arbaro. Ŝi prenis la ĉevalon per la brido kaj prezentis al li la spegulon. Tuj kiam li vidis sian vizaĝon sur la spegulo, li ekkriis: "Malfeliĉo je mi! Estas la Diablo! Estas la diablo kiu konstruis tion, kion vi tenas!"

Li spronis la ĉevalon, la brido estis elprenita el la manoj de Macha, kaj la kavaliro forkuris.

Ŝi revenis al la kastelo kelkajn tagojn sentrafe. La pordo restis fermata.

Macha ploris nokte kaj tage. Ŝi kulpigis la Diablon, pri tio, ke li trompis ŝin, kaj ŝi alvokis lin denove.

La Diablo falis el branĉo de arbo, sur la vojon, tiel, kiel akvero falas de folio post la pluvo.

Macha, plorante, rakontis al li sian malfeliĉon. Nun, ŝi diris, mi estas, per vi, eó pli malfeliĉa ol antaŭe. Ĉar mi ne plu havas la konsolon vidi lin. Li ne ĉesas plu en la arbaro, kvazaŭ li timas iajn sorĉojn.

La Diablo ridegis.

Li povas forkuri, mi ja lin prenos. Li apartenas al mi, kune kun vi; ĉar tiu, kiu vidis sin sur la spegulo, estas al mi.

Macha respondis je fiera voĉo: "Esti, aŭ ne esti, al vi estas ne grave. Tiu, kiun mi deziras estas la kavaliro, vi promesis lin al mi, kaj vi ne donis lin al mi. Vi estas perfidulo!"

La ruzulo respondis: "Mi neniam donas ion por nenio."

Macha estis atŭdinta pri kontraktoj kun la Malamiko, kaj ŝi tremegis.

"Kion vi volas por via laboro?" demandis ŝi, per tremante voĉo.

"Preskaŭ nenion!" respondis la Diablo. "Vian Patron!"

"Mian patron!" ekkriis la terurigita fraŭlino.

"Vian patron," respondis la Diablon malrapide.

Macha respondis: "Neniam!"

"Kiel vi volas," diris la ruzulo, kiu tuj malaperis, kvazaŭ enlutita de la tero.

Macha revenis hejmen malfeliĉa, decidinte morti prefere ol doni sian patron al la Diablo. Ŝi renkontis la lignotranĉistojn sur la vojo. Ili marŝis unu post la alia, kaj portis la hakilojn sur la ŝultro. Ili akceptis Machon per gajaj krioj.

La kastelo restis silenta ankoraŭ kelkaj tagoj, sed, unu matenon, la servistoj kaj la hundoj trairis la ponton, kaj Macha revidis la belan kavaliro. Li galopis antaŭ ŝi, sen vidi ŝin, kiel ĉiame.

Macha frenezigiĝis pro koleró, kaj ekkriis: "Al mi, Ho Malamiko! Al mi!"

La longa kaj maldika formo de la Diablo eliris el musotruo. Li metis sian manon kontraŭ la orelo por ricevi la malproksiman galopon de ĉevalo sur la folioj.

"Aŭdu, aŭdu! Tiu estis la bela kavaliro. Li estas via, se vi volas!"

Macha sopiris. La Diablo daŭrigis: "Post kelkaj horoj la bela kavaliro povos aparteni al vi. Sed mi bezonas vian patron!"

"Prenu lin!" ĝemegis Macha.

La ruzulo tiam puŝis ŝin antaŭ si ĝis la Cervokruco, en tiu loko laboras la patro de Macha.

Noktiĝis, kiam ili alvenis al la loko. La lignotranĉisto dormis, sur la nuda tero, antaŭ malgranda amaso da ligno kiu brulis, kaj de kiu malrapide supreniris fumo. La koro de Macha fluidiĝis, vidante sian patron, sola, sen defendo, fordonita al la Malamiko per ŝi mem, per lia propra filino. Ŝi deziris ekkrii por veki lin. La hakilo brilis sur la herbo; ĝi defendus lin. Sed nenia sono eliras el ŝia gorgo.

La Diablo metis sian hok-forman manon sur la ŝultro de la dormanta viro kaj, prenante lin per la piedoj, turnigis lin rapidege ĉirkaŭ sia kapo. Kiam li haltis, la homa formo de la ligno-tranĉisto malaperis, kaj nur restis en la mano de la ruzulo, speco da plata kaj sonora kesto.

"Nun," diris la Diablon, "donu al mi viajn fratojn. La ilo, kiu devos ĉarmi vian kruelan kavaliro ne estas finita."

"Miajn fratojn," kriis Macha, levigante la brakojn al la kapo pro timego, "neniam!"

Ŝi foriris, malfeliĉa, kaj sercis Traĵanon, Romon, Konstantenon kaj Liveon, kiuj segis en klarajo meze de faligitaj arboj. Ili lasis sian laboron, sed Macha ricevis iliajn salutojn sensente kaj timeme.

Dum la posttagmezo la kvar fraŭloj kuŝiĝis flanko ĉe flanko sur la lignosegejo, por dormi.

*Finola.*

## LA INTERNACIA LINGVO DE HINDUJO.

Originale verkita de George J. Henderson.

Multaj personoj forpelas la ideon de arte-farita lingvo, kiel ne praktikebla propono, kaj anoncas, ke la formado kaj la fondado de tia lingvo estas absurda kaj senespera.

Sed estas ne bone konite, ke la ideo de unu komuna lingvo arte simpligita por uzo inter homoj parolantaj diversajn lingvojn estis jam efektivigita antaŭ tri jarcentoj en la "senmova kaj neprogresema" Oriento!

Lt.-Kolonelo Gordon, sur la ESPERANTA GAZETO, paĝo 8, montris tiun ĉi fakton al la Esperantistoj, sed la sekvantaj rimarkoj eble interesos iujn.

Unu el la plej grandaj gajnoj iam donacitaj al la Hinda regiono el la Oriento estas la fondo de tiu komuna lingvo, Urdu, aŭ Hindustani.

La celo de Esperanto estas ripeti tiun ĉi historion, kaj donaci al la Eŭropa kaj Amerika civilizacio tion, kio estas longatempe efektivigita por cent milionoj da homoj en la Oriento.

Urdu, aŭ Hindustani, estis, en la komenco, nur miksa dialekto, aŭ jargono, kiu devenis en la bazaroj de Delhi post la Mughala venko, kiel komunikilo inter la venkintaj Tartaroj kaj la Hindaj enlandanoj. Sed la unua granda puŝo ĉe ĝia progreso estis donata de la klerega kaj tre potenca imperiestro Akbar, kiu vivis en la deksesaj jarcento.

Li tiam pensis, ke estus utile alfari ĝin, kaj fondi ĝin, kiel la oficiala lingvo de lia regno.

Post la forpelo de la Mughala Imperio, kaj dum la Brita okupado, la uzo de Hindustani farigis pli kaj pli universala, ĝis hodiaŭ, kiam ĝi estas la komuna komunikilo aŭ internacia lingvo de la Hindujo, meze da Babelo de lingvoj kaj dialektoj, inter tiom da homoj, kiom loĝas en la tuta Eŭropo.

Ĝia nomo Urdu estas Tartara vorto, signifanta "soldataro," el kiu ankaŭ devenas la Angla vorto *horde*.

En la komenco ĝi estis iom simila al la *Lingua Castrensis* de la Romaj soldatoj, kaj ĝi ekekestis pro la natura neceseco por ia komuna dialekto por reciproka kompreno, kiam du popoloj estas kunvenintaj pro komercaj aŭ militaj kaŭzoj, kiuj ne povas sin interkompreni.

*Pidgeon-English*, *Chinook* kaj *Pennsylvania Deutsch* estas nun-ekzistantaj ekzempleroj de tiaj naturaj jargonoj, sed Hindustani aŭ Urdu en sia nuna stato, malsimilas tiujn. Ĝi estas on granda parto arte-farita lingvo, ĉar ĝi estis aliformigata kaj alprenata laŭ difinita plano de la Imperiestro Akbar, kiam ĝi estis fondata kiel politika institucio.

## EL EGIPTUJO.

## KARA SINJORO,

Vi diris al mi, ke vi kredis, ke viaj legantoj ŝatus lerni ion pri mia vivado tie ĉi. Nu, mi intencas skribi libreton pri miaj spertoj, kaj mi estas tre okupa pretigante sciigojn por ĝi. Sed mi diros al vi ion, kion mi eklernis hieraŭ; eble ĝi estos surprizo ĉe vi, kiel ja ĝi estas ĉe mi.

Ofte ni demandas cigaredojn Egiptajn, kredante ke ni estas fumontaj tabakon, kiu kreskis en Egiptujo. Sed, de 1890, nenia tabako estas kreskigita en tiu ĉi lando; tial ke la Kedivo estas ĝin malpermesinta. Efektive ĉia tabako venas tien ĉi el Turkujo, precipe el Latakia.

Ankaŭ la cigaredaj paperoj venas el Italujo, kaj oni ne faras paperojn tie ĉi.

La enlanduloj ne eĉ laboras aŭ zorgas pri la cigareda komerco, kaj la cigaredoj estas volvigataj de Grekoj, preskaŭ tute.

En Eŭropo la fumantoj insistas, ke ili ricevos "cigaredojn Egiptajn faritajn de kompanioj Grekaj," tial, en Kajro, estas multe da firmoj Anglaj, Francaj kaj Italaj, kiuj komercas sub titoloj Grekaj.

Mi mem kredas, ke oni enmetas en la cigaredojn

iom da salpetro, sed tie ĉi ili min certigas, ke nenia falsiĝo estas permesata, kaj ke ili ricevas la bonan guston per prudentaj elektoj. Nu, estas eble!

El ĉiuj Egiptaj cigaredoj, tiuj en Kajro faritaj estas ja la plej bonaj; kaj ili estas preskaŭ ĉiuj sendataj alilanden. La enlandanoj fumas ĉiame cigaredojn, sed nur de la malsuperajn kvalitojn.

Da Kajraj cigaredoj ĉiuj estas volvigitaj mane. Ŝufiĉe pri cigaredoj.

Mi baldaŭ iros al Assouan por vidi la novan grandegan akvo-ŝtopilon tie. Malfeliĉe ĝi subakvigis la insulon Philæ, kaj tial rabis de la vojaĝanto unu el la plej belaj vidaĵoj en la tuta mondo. Senpreza monumento de antikveco estas perdita, ĉar nur porcioj da tiuj belaj temploj povas esti vidataj supre la akvo de la Nilo, similaj al juveloj disŝiritaj el siaj tenejoj.

Sed, kompreneble, oni devas kalkuli kiel gajno la pligrandan prosperecon de la enlanduloj, kiu jam okazis, dank' al la plibona akvigado de la tero. . . .

Via sincere,

MARTYN WESTCOTT.

## LA STATO KAJ ESTONTECO DE ESPERANTO EN BRITUJO.

Origine verkita de Colonel H. K. Gordon.

Unue, mi volus diri, ke mi longatempe prenis intereson ĉe diversaj lingvoj, kaj, vojaĝinte multjare eksterlande, mi penadis lerni multe da ili, ekzemple, Franca, Germana, Itala, Norvega, Japana, Birmana, kaj Hindua, tiamaniere ke, aŭdinte pri Esperanto, mi tuj interesigis: post mallonga studo mi sentis min konvikita, ke fine jen estas arta lingvo, saĝa kaj praktika, kiu ne nur iras pli malproksime ol iaj antaŭaj provoj tiun direkton, sed nepre ŝajnas apogi siajn pretendojn por pripensado sur fundamentoj tiel fortaj kaj veraj, ke mi mem ne povas kredi, ke alia ĝin superos.

Kvankam sendube ĝi mem devos pliboniĝi aŭ aliformiĝi laŭ la ŝanĝaj bezonoj, komunaj al ĉiuj mondaj aferoj, al tiuj sangoj ĝia memstara fleksebleco volonte sin pruntas. En ia okazo, ĝiaj fundamentoj estas certe kaj vere fonditaj.

La unua afero kiu frapis min estis tiu ĉi: ke Esperanto ne estas triviala infana ludilo de lingvo, pri kiu oni povas uzadi frazojn banalajn aŭ utopiajn: sed ke estas lingvo por homoj sanspiritaj kaj praktikaj, kiuj en ĝi vidas ilon longatempe bezonitan, kaj kiu en si mem havas la ecojn necesajn por povi tuj fariĝi tiu, kiun ĝi pretendas vere esti, nome, *helpingvo internacia*.

Ni ĉiuj scias kiel ni estas emaj (eble ni Britoj precipe, mi timas), iom kolerigi, kiam ni mankas kompreni parolante aliajn lingvojn, kaj kiel ni kulpas aliajn, kiam ni mem kulpigu, almenaŭ iaparte. En tiaj cirkonstancoj kiel estas eble, ke ni simpatius kun veraj sentoj de aliaj naciaj? Tiel, tuta ebleco ĉe "interkompreniĝo" estas komence mortita, kaj la golfo, malfeliĉe por ĉiuj, pli larĝiĝas ol kontraŭe.

Kaj tiu ĉi pripensado rilatas al ĉiuj aferoj de la vivo ĉe nacioj kaj individuoj.

De la plilarĝa internacia vidpunkto, la malutilaĵoj estas gravaj, kaj estas allasitaj tre longatempe.

Tiu ĉi aperas precipe ĉe aferoj komercaj kaj literaturaj, tiel ankaŭ ĉe socialaj rilatoj.

Interkonatiĝo pligrande reciproka devigos multe da tre profitaj internaciaj rezultatoj, pri kiuj tamen ni ne bezonas nuntempe koncerniĝi.

Ni progresu metode.

Ne estas necese almeti veturilon antaŭ ĉevalo. Tiaj rezultatoj fariĝos aŭtomate en sia propra tempo.

Dume, ni devas pripensadi kiamaniere ni povos alkonduki nian legantaron kaj aliajn personojn ŝati nian eltrovon, kiun ni ŝaldas al la kreinta genio de Sinjoro Doktoro Zamenhof.

Tiel kiel ĉe multe da aliaj similaj veraj eltrovoj

metitaj antaŭ publiko memkontenta kaj skeptika, ne estas facila afero altiri ilian atenton: estas ja malfacile iun eltrovi, kiu eĉ volas aŭskulti sufiĉe longatempe por vidi ĝiajn punktojn, kvankam tio ĉi ne postulas pli ol kelkaj minutoj da klarigado.

Oni devas ekkompreni ke:—

(i.). Esperanto estas lingvo jam plene kaj vere science konstruita, tute preta por tuja efektiva praktika uzado, parole kaj skribe, kaj ne nur frenezaĵo, tia kia eble multe da aliaj estintaĵoj estis.

(ii.). Estas vera postulo por tia internacia help-lingvo.

(iii.). La lernado de Esperanto estas multege pli facila ol la lernado de ia sola alilingvo, kun gramatiko kiu estas modelo de scienca simpleco, kaj ke estas plezura surprizo ĝin ellerni.

(iv.). Homoj, kies nomoj portas sendube aŭtoritaton en aferoj filologiaj, ĝin publike aprobas.

(v.). Nuntempe la amaso da temoj instruitaj ĉe niaj lernejoj permesas nenian tempon por bone lerni eĉ la patrujan lingvon, kaj ĉe multe da okazoj la penadoj por instrui alilandlingvojn sekve montras indiferentajn rezultatojn: kaj tiu ĉi okazas precipe ĉe junaj studentoj, kiuj devas frue forlasi lernejojn por eniri profesiojn kaj komercajn situaciojn, tie gajni vivilon senprokraste.

(vi.). Kiam libertempo okazas por la studado de fremdaj lingvoj (prefere en la landoj mem) akiro de Esperanto estas neniel malhelpo, sed estas vere helpo por lernantoj.

Se ni povas (kaj ni nur povas penadi), konvinki la publikon pri tiuj ĉi punktoj, la memstaraj bonecoj de Esperanto certe trafigos ĝin.

Multe da diskutado nuntempe aperas en ĵurnaloj pri la Greka kaj Latina lingvoj, kiel cerbahj gimnastikaj uzadoj; kiom valoraj tiuj ĉi estu por libertempuloj, kiuj deziras ilin lerni legante, parolante, kaj skribante, la frua studo precipe de la gramatiko sendube naŭzas la plej multe da lernantoj, kvankam ili ĝuas tradukojn. Nenio povas esti plifacila ol la gramatiko Esperanta. Se oni deziras lerni la bilardaludon, oni uzas rektan ilon, anstataŭ la pinton de ombrello—kvankam eble oni povus penade ludi tiamaniere!

Se cerbahj gimnastikaj uzadoj estas valoraj, ĉu ni ne havas matematikojn, kaj el ludoj, ŝak,—kaj vist-ludojn?

En la ĉiutagaj ĵurnaloj nuntempe multa diskutado okazas kontraŭ la Stato de Edukado en tiu ĉi lando, pri kiu vastega sumo da mono elspezigaĝas.

Pro la severa konkurso, precipe el Germanujo kaj Ameriko, oni plendegas, ĉiaflanke, je nesufiĉaj

rezultatoj. Oni diras ke niaj knaboj, el ĉiuj klasoj de Societo, foriras de lernejo kun malmulte, eĉ neniom, da inteligenta taŭgeco kontraŭ la vivbatalado. Ke kamparanoj lasas lernejon atinginte nenian kapablecon je ia metio, kaj kun nenia deziro pliiĝi sian sciadon, tia kia ĝi estas, kaj tiel nekapablaj legi inteligente, ke ili ne havas la eblon fari progreson, eĉ tion dezirante. Kaj ke ili ricevas nenian sciencan instruadon nek kuraĝadon tiun direkton. Ke junuloj difinitaj por la Militistaro aŭ la Reĝa Ŝiparo povas nek skribi nek silabi ĝuste sian propran lingvon, kaj konas preskaŭ neniom da alilandaj lingvoj, da geografio aŭ da ĉirkaŭteknikaj natursciencoj.

Ankoraŭ, aliaj, starante pli alte, eliras el Kolegio kun malmulte pli ol supraĵa kono de Latina kaj Greka, sen povi sennene paroli ian modernan lingvon.

La celo de Edukado estas instruadi lernantojn pri sciencaj pensad-metodoj, instruadi ilin kiel ellernadi kaj deprenadi por si mem, laŭ la maniero la plej efektiva kaj sen malŝpari valoran tempon: tiel ke, kiam ili lasos la lernejon, ili sin sentos kuraĝigitaj je plia studado: anstataŭ ol, kiel kutime, naŭzitaj je verko, pleje libraverko ĉambre, kun ĝia akompananta nesicio pri ĉirkaŭaferoj.

Unue, ŝajnus necese koni, se estus eble, por kiu metio aŭ profesio la knabo estas edukota: ni konas, ke tio ĉi ne ĉiam estas ebla. Tiaokaze ĝenerala praktika instruado, alfarita al lia stato, estas ĉio, kio estas cirkonstanco ebla. Sed, kiam tio estas konata, la afero estus multe pli facila. Videble, ne estas rezono instruadi por Inĝeniero knabon iĝonta farmisto, aŭ por la Ŝiparo Reĝa se iĝonta Soldato aŭ por Advokato se iĝonta Kuracisto, k.t.p. Tiamaniere, devas esti punkto kie instruado devas komenci specialiĝi, prefere ĉe lernejoj specialigitaj.

Rilate knabinoj, ne okazas la sama malfacileco: kvankam ĝi iom ekzistas.

Kompreneble, por la alta edukado, precipe kontraŭ la libertempuloj, niaj Universitatoj provizas okazon: kvankam sendube ili estus plibonigeblaj.

Ne estas kaŭzo por timi, ke iu, bezonante studi Latinan aŭ Grekan aŭ ian alian lingvon, vivan aŭ nevivantan, ne trovos plenan okazon en la estanteco, kiel en la estinteco.

Kontraŭ Latina kaj Greka, oni pretendas ke, ĉar ili estas lingvoj tre malfacilaj, ilia akiro farigas neegalan instruadon por la spirito: kaj forigante ilin, ni ne povus ĝuste kompreni nian propran lingvon.

Kvankam tio ĉi eble estas iom vera, kaj kono pri ili, tiel ĉia scienco, estus profite akirinda, estas ja multe da verkistoj de pravegaj Anglaj libroj, kiu scias nenion pri ili.

Tial ili ne estas necesaj, kaj vortodeveno estas lernebla el lernolibroj, aŭ eĉ el bona vortaro, Scienco pri historio de la homa progreso estas atingebla per tradukoj el lingvoj nevivantaj kaj vivantaj. Sinjoro Profesoro Huxley diras: "*La vera celo de vivo ne estas scienco, sed agado.*"

Nun, por la ordinara lernanto, eble estos utile instruadi "ESPERANTO," ĝis kiam li povas trovi tempon por lerni estontajn utilajn alilandajn lingvojn. El ESPERANTO li povas lerni la gramatikon en la formo la plej severe simpla, kaj sciencan, fondita sur la sperto el multe da gramatikoj de nunaj kaj antikvaj lingvoj. Plie li nepre trovos ĝin vortodevena helpon pri la lernado de modernaj lingvoj.

Ankaŭ, oni demandas, ke niaj junuloj devas ricevi instruadon pri patriotismo, siaj rajtoj kaj devoj kiel Angloj: la graveco de nia Imperio, la Administracio de nia patrujo, k.t.p.

## LA OFERO DE LA SKULPTISTO.

Tradukita de C. S. Bickell.

Skulptisto, kiu treege penadis sed trovis sin preskaŭ sen nutraĵo, ĵus estis fininta laboron, je kiu li estis metinta ĉiujn siajn esperojn.

Ĝi estis plastra modelo de bela virino, kaj la artisto enamigis en la senvivantan figuron sur kiu li elspezis tiom da tempo kaj laboro. Li ja esperis, ke ĝi metus lin sur la vojon, kiu kondukas al la Famo kaj al la Riĉeco.

Estis malvarmega nokto, kaj la malfeliĉa viro, tremetante pro malvarmo en sia mizera subtegmento, maltrankviliĝis pri la sendangereco de la modelo, ĉar la frostoj estas pereiga malamiko al la plastro.

Kun sopiro de laceco kaj kun ĝemo kiu trapasis lian maldikan korpon, li demetis la eluzitan veston

de siaj nevestitaj ŝultroj. Ameme li drapiris la figuron per la malnova vesto, kaj, ĵetinte sin teren apud ĝi, li dormadis.

Kiam la mateno venis, la frosta suno malfacile ĵetis siajn radiojn tra la fenestro de la subtegmento kaj brilis sur du figurojn, malvarmaj kaj senvivantaj.

La skulptisto kuŝis morte glaciiginta apud sia bela kreitaĵo: li donis sian vivon pro la arto, kiun li tiel amis.

Multaj artistoj, kortuŝataj pro la malfeliĉa sorto de nekonata frato, monofaris sufiĉan sumon por fari bronзан modelon de la virina figuro, kaj oni metis surskribon sur la pedestalon de la statuo, rakontantan la malĝojan historion de la ofero de la skulptisto al la Arto.

WORDS BY  
EDWARD METCALFE  
M. A. OXON

# Dormu !

MUSIC BY  
F. G. ROWE

Copyright, 1905, THE ESPERANTIST, LONDON

The first system of musical notation consists of a treble and bass staff. The treble staff contains a melodic line with various note values and rests. The bass staff contains a harmonic accompaniment with chords and single notes.

Dormu, Dormu en lulilo Paĉ ja, Panja  
Kovras ja flugilaj vestoj Sur birdetoj  
Dolĉa en lulil' trezoro, Ŝlosilet' de

The second system of musical notation continues the melody and accompaniment from the first system. It features similar rhythmic patterns and harmonic structures.

korliĝi-lo; Panjo ja apude sidas Ĉi al panja am' konfidas,  
en la nestoj Sed flugiloj cin anĝelaj Kovras en mallumo helaj;  
panja koro, Cin al brakoj mi konfidas Kies ci vizagon vidas;

The third system of musical notation continues the melody and accompaniment. It includes a key signature change to one sharp (F#) in the bass staff.

Ci en sendanĝero estos Panjo ja apude restos; }  
Ci en sendanĝero restos Ĉar anĝeloj apudestos; } Laŭ infano  
Ci en sendanĝero restas NIA PATRO apudestas; }

The fourth system of musical notation concludes the piece with a final melodic phrase and accompaniment. It features a key signature change back to one flat (Bb) in the bass staff.

el konfido Dormu kara mia ido, Dormu, dormu, dorm', dormu, dormu, dorm' !

18. Vol. II. No. 4.

THE

April, 1905.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- 14 francs; 1½ roubles; 75 centes.

Wholesale Agents: 45, Dean Street, London, W.1.

All Communications should be sent to THE EDITOR, 45, Abchurch Lane, London, E.C.4.

## CONTENTS.

|   | PAGE |
|---|------|
| French. <i>Maître (Poetry Tale by B.W.)</i> ...   | 45   |
| Mostra de Beato ... ..  | 44   |
| A. B. <i>Praktikoj de Esperanto</i> , Alphonse<br>Daudet (translated by P. de Borchgrevink) | 42   |
| London by the First Victor (translated<br>by F. L. G. Marshall) concluded ...               | 53   |
| Health (Review). <i>Poet. — H. Edward<br/>Woodie, M. A., Oxon.</i> ...                      | 47   |
| A. <i>Mikrozo (D. H. Lambert, B.A.)</i>   | 56   |
| <i>Five Lines and Ten Lines (A. M. Mason)</i>   | 47   |
| <i>Original Revision (Thomas Hodgson)</i>   | 38   |
| <i>Journal's Verse on the Russian<br/>Question (Charles Johnson)</i> ...                    | 44   |
| <i>Maître from the Esperanto Journal<br/>by P. de Borchgrevink</i> ...                      | 42   |
| <i>— Esperanto's name changed to La<br/>Gaz. (F. S. Hodge)</i> ...                          | 46   |
| <i>Departure and Return (A. E. and<br/>D. B. Lamborn)</i> ...                               | 42   |
| <i>Propaganda, R. E. Hodge (translated<br/>by T. de Key)</i> ...                            | 45   |
| <i>Small. Esperanto's Ten-year History<br/>(translated by V. T. de Key)</i> ...             | 44   |

## AVIZO GRAVA.

La malnova firma Buchanan, Scott & Co. fondita en la jaro 1870, prezentas sian komplementon al la Esperantistaro kaj anoncas ke, post nelonge, internaj kaj personaj proponoj akompanitaj de la agoro. Ĉiu Esperantisto, en nuntempo de la juna grupo, se lias nome, anstataŭe de la Admoro de J. J. Jamniet, ĉiu estas akcepti sian ĉi proponon por komenci en ĉiu spaco al si specialan salaron kaj ankaŭ anstataŭigi la direktoron de Esperanto.

BUCHANAN, SCOTT & CO.,

Geethland Street,  
City, Glasgow, Scotland.





# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĜE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Bro. T. Čejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelngatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povus sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

18. [Vol. II., No. 4.]

APRIL, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## DAVDO DHU.

Ferakonto originale verkita de E.W.

Seka printempo sekvata de somero varmega faris neŝipireblaj eĉ la plej grandajn riverojn, tial ke la Sisaĥoj reiris Orientan Britujon, forlasante la belegajn regionojn, kiujn ili ruinigis.

Iom post iom revenis en siajn hejmojn la mizeraj kamparanoj, sola restaĵo el multaj centoj da feliĉaj kaj diligentaj homoj.

El tiuj ĉi preskaŭ ĉiuj mortis batalante pro la patrujo, aŭ, perdinte esperon, serĉis alilande la liberecon, kiun ili ne plu povis defendi ĉe si.

Sed, inter la malfortuloj, la virinoj kaj infanoj kiuj plorante revidis siajn senhomajn vilaĝojn, troviĝis almenaŭ unu heroo.

Davdo Dhu, tiel nomata pro la nigreco de liaj haroj kaj okuloj, estis farinta miregindaĵojn de boneco, pacienco kaj saĝeco dum tiu ĉi melankolia reven-tempo.

Unue li sole esploris la landon por scii ĉu la malamikoj ja forlasis la scenejon siaj kruelegoj. Tion eltrovinte, li multe komfortis kaj kuraĝigis la revenantojn kaj laboradis tago kaj nokte al la rekonstruo de ter-mura protekto kontraŭ luparoj, kiujn la odoro de neenterigitaj homoj kaj bestoj allogis el la montoj kaj arbaroj.

Neniam li dormis sub tegmento ĝis ĉiu alia kapo kuŝis en hejmo sia.

La vilaĝanoj lin amis kaj respektigis, vidante en li iom da superhoma, ili volonte estus elektintaj lin sia princo, sed li insiste rifuzis altiĝi super siaj kunuloj. Li volis nur ilin servi. Estante orfo, oni

urĝis lin edziĝi, sed tion ankaŭ li rifuzis, sciante ke multe da junuloj bezonis pli ol li vivadon feliĉan.

Pro la rabadoj kaj detruo faritaj de la lupoj oni revivigis antikvan leĝon, kiu permesis al neniu edziĝi antaŭ mortigi difinitan nombron da lupoj.

Davdo helpis ĉiujn fraŭlojn ĉasi, kaj alporti ilian takson de kapoj kaj feloj, ĝis kiam ĉiuj, kiuj ĝin deziris, fariĝis fianĉoj aŭ edzoj.

La plej bela fraŭlino el ĉiuj estis rifuzinta multajn proponojn. Oni diris ke ŝi reservas sin por la heroo. Ŝi estis sprita, lerta kaj ĉarma. Kiam do Davdo pripensis la amon, nature li enamiĝis en ŝi, kaj ŝi konfesis al li longe kaŝatan amon.

Ĉiuhore li revis pri Sisilo, sed li estis serioza, kaj tute ne parolema, tiel ke neniu sciis lian senliman amon pro la fianĉino—eble ŝi mem eĉ ne sciis ĝin.

Avide dezirante akiri kiel eble plej baldaŭ sian imoŝton da feloj, Davdo ĉasis preskaŭ ĉiun duan tagon, kun neŝanĝa sukceso, sed, enfine, la bonŝanco mankis al li.

Ĉasata de luparo li provis salti trans larĝa profundaĵo, sed li falis, glitadis kaj nekonsciiĝis.

Kiam li iom reviviĝis, li sin sentis subtenata de molaj brakoj. Konfuze li demandis: "Kie mi estas? Kies brakoj tenas min?"

Voĉo dolĉega murmuris: "Vi restas sur la brusto kiu vin nutris dum via infaneco, vin ĉirkaŭas la brakoj kiuj tiam vin portis."

Kiam Davdo refortikiĝis, la feino parolis kun li tiel aminde kaj sincere, ke li kuraĝis ŝin demandi por ke ŝi lin elŝtelis de liaj gepatroj, kaj kiu estis la infano tie forlasita anstataŭ li.

Ŝi klare kaj afable respondis: "Al ni feinoj ja estas permesite edziniĝi kun viroj. Se, dum la tuta vivo, la viro restas fidela, la feino ricevas senmortan animon. Ŝi povas elekti aŭ morti kun li, aŭ longan vidvinan vivon, lumigitan per la espero por eterna reunuigo. Fea edziĝo konsistas nur el manpremo kun kiso. Tia simpla ceremonio nur ligas honorulon. Feino, kiu sin degradis per amo por perfidulo devas necese penton fari per disŝiro de ĉiu ligo kiu ŝin memorigas de li.

Forlasite, mi devis forpeli mian idon, kaj, ĉar mi konis la bonecon de viaj gepatroj, mi anstataŭis al ili mian trezoron, kaj ŝtelis vin. Mi tion lastan faris, ĉar, laŭ niaj leĝoj, ĉiu feino devas varti infanon almenaŭ dum kvardek jaroj.

Mi sciis ke, kun ili, vi ne perdus la ĉe ni infusan bonecon. Vere feoj estas virtaj, sed tiu virto ne estas laŭdinda, ĉar ni ne povas senti malbonan deziron. Bonfari estas nia naturo, nia vivo mem. Homoj per feinoj nutritaj, per feoj instruitaj, devas fariĝi la plej granda beno de la homaro. Vi, karulo, estos la koro kaj la cerbo de viaj venkitaj Britoj. Vi vane ne vivos!

Apenaŭ resaniĝinta, Davdo volis iri hejmen sed ne povis. Laŭ fea leĝo, devas neniu homo felandon lasi veka kaj konscia. Tial estis dormante ke li portigis de vilaĝo en vilaĝon, de monto al monto, de kaverno en kaverton, por prediki la evangelion de rezignacio.

Malmultaj kaj malfortaj, la Britoj ne povos sukcese kontraŭstari al la barbaroj. Ili do devas cedi kvazaŭ al dekreto de Dio, devas servi senhonte la novajn regnestrojn, penadi ilin plibonigi kaj konverti al Kristo.

Davdo transportigis eĉ en Kimrujon, kie li trovis la pli militaman popolon pri kiuj la profeto Taliesin diris, ke, multon perdinte, ili ĉiam gardos sian sovaĝan landon kaj belan lingvon.

Al la Kimroj Davdo rekomendis virton, unuecon, kaj bataladon. Ĉirkaŭ la urbo de Merlino li vidis popolon preskaŭ feliĉan, tutfide kredantan en ilian profetion. Pri ŝi ili diris: "Ŝi estas inspira virgulino, amata de Dio, de anĝeloj, de sanktuloj kaj de tiom da feoj, kiom homoj. Ŝi loĝas en la monteto de la profeto, klopodas pri lia domo atendas lian vekigon, legas lian libron, kaj klarigas al ni lian volon. Ni tute ne bezonas alian juĝanton, pastron aŭ reĝon, ol nia Vivieno."

Unu matenon Davdo, vekigante en sia hejma vilaĝo ĝoje rapidis ĉe Sisilo, kaj sciigis de ŝiaj gepatroj ke, lin kredinta pereitan, ŝi antaŭ ok monatoj edziniĝis.

Lia koro ĉesis bati, dum kelkaj momentoj li nenion vidis nek aŭdis. Tiam silente li formarsiis.

Tiun tagon li sin kaŝis.

Morgaŭe la vilaĝanoj vidis la saman gajan aktivan helpeman viron, kiun ili perdis antaŭ du jaroj.

Nokte li ofte ploris. tage li sin devigis pensi nur pri siaj najbaroj. Kiam li ne volis malĝojigi pro sia doloro, li rakontis pri sia falo, kaj sia savo de la feoj; pri lia misio kaj pri ĉio, kion li vidis en Britujo kaj Kimrujo. Sed pri la felando li parolis neniam, ĉar bone li ellernis ke homa lingvo ne povas esprimi sentadojn aŭ eĉ agadojn feajn.

Tiamaniere pasis unu jaro. Davdo, silente batalante, tute venkis sian doloron. Sisilo estis feliĉa, la vilaĝo prosperis, sed homoj devis severe laboradi por vivi, kaj li helpis al multaj.

Varmegan vesperon, junulino portis lignon el la arbaro. Ŝi estis pala, maldika, kaj tro malforta por tia laboro, sed sia patro kaj gefratoj mortis, kaj sia patrino estis malsanulino kiun ŝi, Mirio, sole subtenis. Mirio ne posedis spriton, lertecon, aŭ belecon. Ŝi estis tute sen geamikoj kaj sen espero.

Fleksigita sub sia ŝarĝo, kaj preskaŭ svenanta, ŝi ĝin sentis subite forprenata, kaj ŝi aŭdis la voĉon de Davdo, kiu diris: "Tiu ĉi ne estas virina laboro. Mi portos la lignon, mi petas tenu brakon mian."

Sen ia penso pri amo aŭ edzeco, li diris al Mirio, ke ne estos necese ke ŝi plu laboru, ĉar li estos filo al ŝia patrino.

Mirio nekomprenis kaj ĝoje akceptis la neintencan proponon. Ŝi estis tiel feliĉa, tiel danka, ke li ne kuraĝis vidi la doloron kiun kaŭzus la scio de ŝia eraro. Li do nur diris ke li morgaŭe vizitos la patrinon.

La tutan nokton li vagadis en la arbaro kaj aŭskultis fojn voĉojn. Li bezonis konsilon.

Kio estis la fea konsilo kiun li ricevis? Jen estas:

"Vi estas aminta, sed neniam vi reamos. Mirio ne estas amata de ĉiuj; oni diras ke ŝi estas ne verema kaj bonkora. Ŝi estas do sufiĉe kompaktinda! Ĉu vi volas plimultiĝi ŝiajn dolorojn per rifuzo de la amo kiun ŝi neniam estus espriminta se vi ŝin ne trompis per vortoj maldiskretaj. Bedaŭro estas parenco de la amo. Sed ĉu la bedaŭro ne mortos, kiam ŝi estos kontenta, ĝojega? Ne timu!"

Davdo kaj Mirio farigis geedzoj.

La vilaĝanoj miregis, sed lia ĝentila bonega respekto por la malforteco havis tiom da simileco al timema amo, ke ili tute trompigis.

Post kvardek jaroj gefiloj kaj genepoj enterigis Mirion apud la antaŭ ne longe morta Davdo, la heroo, patrioto, kaj saĝulo—Davdo Dhu.

## MONATO POST MONATO.

Enlandaj & eksterlandaj Korespondantoj skribis aprobante la rimarkojn faritaj lastan monaton pri la fondigo de Internacia Esperanta Komitato. Nun estas konsiderinde en kia direkto restas ĝiaj funkcioj.

Sajne ĝi ne posedos iometon plu da aŭtoritato por ŝanĝi la formon de la neelparoleblan vorton *scii*, aŭ por forigi la uzon de la vorto *ol* post *anstataŭ*, ol posedas jam la ordinara Esperantisto. Sed ekzistas multaj manieroj, laŭ kiuj tia organizaĵo povos elmontri sian valoron, & kore ni invitas niajn legantojn, ke ili pripensu la aferon, & sendu al ni siajn proponojn, zorge evitante "neeblaĵojn"! Ni klopodos por ke la ricevotaj respondoj estu submetitaj al la Bulonja Kongreso, ĉe kiu tiom da ni ĉeestas.

Bedaŭrinde, via Redaktoro povos ĉeesti Bulonjon nur de Aŭgusto 5 ĝis 8.

Sed, kiel kompenso pro ĉi tiu malfeliĉo, li donas al si la privilegion ekviziti multajn samideanojn en Alĝero, Multujo, & aliloke.

Ĉar estas, malkontentige, neeble esti ĉe du lokoj je unu & la sama momento, estas neeviteble ke korespondantoj devos atendi kelkajn semajnojn por respondoj al iliaj afablaj komunikadoj. Sed, Majfrue ni esperas reordigi la aferojn kiel kutime. La eldonigo de la THE ESPERANTIST kompreneble daŭriĝos kiel kutime. La Maja kajero jam presigis.

La progreso dum la pasinta monato ne estas estinta speciale rimarkinda.

Artikoloj alvenis el Queensland, Hindujo, & la Unuigitaj Ŝtatoj, kiuj vekigis iom da intereso. Nova grupo fondiĝis ĉe Chippenham (Wilts), kies Hon. Sek. estas S<sup>ro</sup> Harry Wiltshire, Pierrepont House.

S<sup>ro</sup> Rhodes (Keighley) eldonigis belforman Rimvortaron (kosto 70c.) kiu utilos al niaj estimindaj poetoj. Ni ankaŭ ricevis numeron de la *Alĝera Duonmonata Stelo*, kiu, sendube, estas nukleo por pli granda organo de niaj Nord-Afrika kumbatalantoj.

El nedirekta deveno alvenis la sciigo ke Japonaj kunstudentoj intencas fondiĝi sian Esperantan organon.

Konkludante, ni deziras danki ĉiujn verkistojn pro ilia afableco; & kvankam ni plenege estimas la sindoneman laboron de niaj oftaj verkantoj, ni precipe deziras danki tiun kreskantan aron da diversnacianoj kies verkoj aperas sur niaj paĝoj por la unua fojo.

## MONTH BY MONTH.

Correspondents at home and abroad have written approving of the remarks made last month concerning the foundation of an International Esperantic Committee. It is now to be considered in what direction its functions lie.

Apparently it will not possess one iota more of authority to change the form of the unpronounceable word *scii*, or to abolish the use of *ol* after *anstataŭ*, than the ordinary Esperantist possesses at present. But many ways exist in which such an organisation can show its value, and heartily do we invite our readers to consider the matter and send us their suggestions, taking pains to avoid "impossibilities." We will see that the replies received be submitted to the Boulogne Congress, at which so many of us will be present.

Unfortunately, your Editor can be in Boulogne from August 5 to 8 only.

But, as compensation for this disappointment, he is allowing himself the privilege of paying a flying visit to many fellow students in Algiers, Malta, and elsewhere.

As it is, unfortunately, impossible to be in two places at one and the same time, it is inevitable that correspondents will have to wait some weeks for replies to their kind communications. Early in May we hope to put things in their usual working order once more. The publication of THE ESPERANTIST will, of course, continue as usual. The May number has already been printed.

The progress of last month has not been especially remarkable.

Articles have come to hand from Queensland, India, and the U.S.A., which have aroused some interest. A new group has been founded at Chippenham (Wilts), the Hon. Sec. of which is Mr. Harry Wiltshire, Pierrepont House.

Mr. Rhodes (Keighley) has issued a neat Rhyme Vocabulary which will be useful to our esteemed poets. We have also received a number of the *Alĝera Duonmonata Stelo*, which will doubtless form the nucleus of a larger organ for our North African friends.

From an indirect source comes the news that Japanese Esperantists intend to found their Esperanto journal.

In conclusion, we wish to thank all contributors for their kindness; and, although we fully appreciate the devoted work of our frequent contributors, we especially thank that growing number of "Internationals" whose compositions appear on our pages for the first time.

## RENKONTIĜO NEATENDITA.

De Alphonse Daudet, tradukita de Paulo Burjado (Narbonne).

“Blidah! Blidah!” ekkriis la kondukisto, malfermante pordokurtenon.

Konfuzo, tra vitraĵoj malglatigitaj de nebuleco, Tartareno de Taraskono ekvidis placon de beleta subprefekturo, placon regulan ĉirkaŭatan de arkadoj kaj plantatan de oranĝujoj, meze de kiu plombaj soldatoj ekzercadiĝas en klara nebuleco roza de la mateno. Ĉe la kafejoj oni deprenis la fenestro-kovrilojn. En angulo, halo kun legomoj.

Estis ĉarme, sed tio ne odoris ankoraŭ la leonon.

“Al sudo! Pli al sudo!” murmuris la bona Tartareno, reinterniĝante en sian angulon.

Jus tiam, la pordo malfermiĝis. Bloviĝo da aero freŝa eniris, alportante per siaj flugiloj kun parfumo de la oranĝujoj florigantaj, malgrandetan sinjoron aveljake vestitan, maljunan, sekan, sulkigitan, simetrie regulan kun figuro dika kiel pugno, kravato nigrasilka alta je kvin fingroj, leda paperujo, pluvombrelo: la vera notario vilaĝa!

Ekvidante la militilaron de la Taraskonano, la malgranda sinjoro, kiu sidigis kontraŭe, ŝajnis trege surprizata kaj ekrigardis Tartarenon kun insisteco ĝenanta.

Oni maljungis, oni jungis. La veturilego forkuris.

La malgranda sinjoro rigardadis ĉiam Tartarenon, kiu fine malpacienis.

“Tio mirigas vin?” diris li, rigardante siavice la malgrandan sinjoron plenvizagen.

“Ne, tio ĝenas min,” respondis la alia tute trankvile, kaj ja per sia tendŝirmilo, sia turnpisto, siaĵu du pafiloj en iliaj ingoj, sia ĉastranĉilo kaj plie sia korp-amplekso natura Tartareno de Taraskono okupis multon da loko.

La respondo de la sinjoro incitis lin.

“Ĉu vi imagas okaze, ke mi iros al leono kun via pluvombrelo?” diris la granda homo kun fiereco.

La malgranda sinjoro rigardis sian pluvombrelon, ridetis senbrue; poste, ĉiam kun la sama flegmo: “Tiam, sinjoro, vi estas . . . ?”

“Tartareno de Taraskono, mortigisto de leonoj!”

Elparolante tiujn vortojn la brava Taraskonano skuis kiel kolhararo la glanon de sia ĉekia.

Igis en la veturilego ekmovo de miregiĝo.

La Trapisto faris la signon de la Kruco, la du virinoj elpuŝis krietojn de timiĝo, kaj la fotografisto de Orléansville alproksimiĝis al la mortigisto de leonoj, jam revanta la honoron kiun li faros lian fotografilon.

La malgranda sinjoro, li ne konfuziĝis.

“Ĉu vi jam mortigis multe da leonoj, Sinjoro Tartareno?” demandis li tute trankvile.

La Taraskonano akceptis lin per bona maniero.

“Ĉu mi mortigis multe da ili, sinjoro! Mi deziras por vi, ke vi havu nur tiom da haroj sur la kranio!” Kaj ĉiu veturilano ekridis, rigardante la tri flavajn harojn kiu stariĝas sur la kapo de la malgranda sinjoro.

Sia vice, la fotografisto de Orléansville ekparolis:

“Terura profesio la via, Sinjoro Tartareno! Oni travivas iafoje malbonajn momentojn. . . . Tiel tiu kompatinda Sinjoro Bombonel.”

“Ha jes; la mortigisto de panteroj,” diris Tartareno iom malŝate.

“Ĉu vi konas lin?” demandis la maljuna sinjoro.

“Ho per Dio! ĉu mi konas lin! . . . Ni ambaŭ ĉasadis pli ol dudekfoje kunekun.”

La malgranda sinjoro ekridetis. “Vi ĉasas do ankoraŭ la panterojn, Sinjoro Tartareno?”

“Iafoje, por pasigi la tempon,” diris la obstinega Taraskonano.

La aldonis, relevante la kapon per gesto heroa, kiu elflamigis la koron de la du virinoj: “Tio ne valoras la leonon!”

“Sume,” riskis la fotografisto de Orléansville, “pantero estas nur dika kato!”

“Nepre ĝuste,” diris Tartareno tute ne malkontenta, ke li humiligis iom la gloron de Bombonel, precipe antaŭ la sinjorinoj.

Ĉi tie, la veturilego haltis, la kondukisto venis por malfermi la pordokurtenon, kaj, turnante sin al la malgranda maljunulo: “Jen vi estas alveninta, sinjoro,” li diris kun plena respekto.

La malgranda sinjoro sin levis, malsupreniris kaj, antaŭ li refermis la pordon, li diris: “Ĉu vi volas permesi, ke mi donu al vi konsilon, Sinjoro Tartareno?”

“Kian, sinjoro?”

“Mian fidon! aŭskultu, vi havas ekzterajn de bona viro, mi preferas diri al vi tion, kio estas.

. . . Revenu vi rapide Taraskonon, Sinjoro Tartareno. Vi perdas vian tempon ĉi tie. Restas ja ankoraŭ kelkaj panteroj en la provinco, sed fi! ĝi estas tro malgranda ĉasaĵo por vi! Sed pri leonoj, estas finite. Ne restas uuu en Algerio . . . mia amiko Ĉasaing ĵus mortigis la lastan!”

Poste la malgranda sinjoro salutis, fermis la pordokurtenon, kaj foriris ridante, kun sia paperujo kaj pluvombrelo.

“Kondukisto!” demandis Tartareno kun sia kutima grimaceto. “Kiu do estas tiu bona homo?”

“Kiel eble! Vi ne konas lin? Sed li estas Sinjoro Bombonel.”

## LA LEGENDO PRI LA UNUA VIOLONO.

El la Franca de Jean & Jérôme Tharaud, tradukita de F. L. G. Marechal.

En la direkto de la Kastelo, oni sonigis la ĉaskornon. La ĉasistoj venis al Macha. Tra la arboj ŝi rekonis, meze de lia brilanta sekvantaro, sian amaton, klinantan super la kolo de la ĉevalo. Neniam li aperis al ŝi tiel bela, ol en tiu momento. Ne plu li estas viro, sed vivanta revo, mirinda kreitaĵo de ŝia deziro.

Ŝiaj fratoj estas ankoraŭ etendataj en la dormego de la juneco.

La blovo de varmega elspiraĵo turnigis ŝin. Satano estis tie kaj, per gesto, li montris la dormantajn ligno-tranĉistojn, kaj tiam li pantomimis kiel viro, kiu postulas monon.

Macha tordis siajn brakojn supre la kapo. Ŝi adoregis siajn fratojn . . . tamen ŝi fordonis ankaŭ ilin al la Diablo!

Tiu ĉi metis en sian maldekstran manon (pli rigida ol ŝtalo) la duan fingron de Trajano; per la dekstra mano li prenis la finon de la fingro; li tiris ĝin kiel fadeno.

Kiam Macha turnis la kapon, ŝi vidis la duonon de la korpo de Trajano ĉe la interna parto de la diabla mano, kaj la alian duonon transformigata en longan kaj maldikan fadenon. Pli senmova ol la trunkoj de la arboj, ŝi vidis la restaĵon de sia frato iom post iom pasi tra la malgranda truo, dum la fadeno ĉiam plilongigis kaj fariĝis pli kaj pli maldika.

Kiam lia tuta korpo trapasis, la Diablo tranĉis fadeneron tiel longa kiel la homa brako.

"Tio ĉi ne estas multe," li diris, "Mi kontentiĝas pro ne multe."

Romo tenis per la mano la apoglokon, kiu utilas por segi la lignon. La ruzulo prenis lin per la piedoj kaj, turniginta lin rapide kiel ŝnuristo turnigas sian ŝnuron, li marŝas malantaŭen ŝpinanta fadenon, kiu grandiĝis ĉiam, dum la korpo de Romo ĉiam maldikiĝis. Kiam la ŝnuro estis maldika kaj brilanta, la Diablo tranĉis parton de ĝi, ankaŭ tiel longa kiel la homa brako.

Kiam li alproksimiĝis al Konstanteno, Macha kriegis, sed eĉ ŝi mem aŭdis nenion. La Diablo prenis lin per la kapo kaj la piedoj, kaj transformis lin en glas-globo, kiun li eltiris ĝis li obtenis brilegan fadenon. De tiu ĉi li ankaŭ detranĉis porcion, tiel longa kiel homa brako.

Liveo sole restis. Macha kuris al li por savi lin. Ŝi levigis lin sur siaj brakoj, sed la piedoj ne povis plu kuri.

"Mirinde," diris la Diablo, kaj, prenante haron el la barbo de Liveo, li komencis eltiri ĝin, dum Macha svingigis Liveon per aŭtomata movo, kaj la korpo de ŝia frato pezis malpli kaj malpli, kaj

ŝiaj brakoj fine falis kontraŭ ŝia korpo. Liveo nur estis silko, kaj Satano detranĉis pecon tiel longa kiel homa brako.

La kvar fratoj de Macha ne ekzistis plu!

Ĉe la supra parto de la plata kaj sonora kesto—kiu estis la korpo de la patro—la Diablo nun alligis kvar fadenojn, unu dika, alia diketa, alia maldiketa, alia maldika.

Macha ne cedis je timego. "Nun, la kavaliron!" ŝi ekkriis.

"Pacienco!" respondis Satano, "la muzikilo ne estas finita."

"Kion vi ankoraŭ volas?" kriis Macha furioze.

"Preskaŭ nenion!" li respondis.

Macha rigardis la Malamikon en la okuloj kaj legis lian penson. Ŝi mallevis la kapon. Pli ol sia patro, pli ol siaj fratoj, ŝi amis sian patrinon.

"Prefere demandu al mi mem la vivon!" ŝi diris.

"Vian vivon! Ne, estas via animo, kiun mi bezonas!" Satano respondis.

La Diablo foriris en la arbaron, pinĉante la kordojn de la violono per reva fingro. Macha rekonis la animojn de siaj fratoj en tiu ĉi malgaja muziko. La plej dika el la fadenoj signifis la solenecon de Trajano, la dua figuris la melankolion de Romo, la tria la aman koron de Konstanteno, kaj la lasta la senzorgan animon de Liveo.

Macha revenis al la kajuto.

La arbaro estis plena je malbonaj voĉoj. La bestoj persekutigis, la birdoj ĉasiĝis.

La patrino de Macha, maltrankvila pri tio, ke ŝi ne vidis sian edzon nek filojn, sidigis sur arbotrunko antaŭ la kajuto. Tie, ŝi dormis.

La luno klarigis la herbon de la klaraĵo.

Macha ne kuragiĝis eniri en tiun klaraĵon. Ŝi haltis en la noktaj ombroj, kaj rigardis. La patrino ŝajne estis senviva. Ŝiaj longaj oraj haroj falis sur la ŝultroj kaj vestis ŝin ĝis la zono.

Multaj memoroj revenis al Macha. Ŝi deziris morti.

Najtingalo kantis. Per ĝia voĉo la arbaro refariĝis sorĉa ama loko. Macha apogis sin, sufokanta kontraŭ kverk-trunko. La najtingalo daŭrigis sian pasian kanton. Vento tremetigis la foliojn; la Diablo eliris el la ombro, kaj trairis la klaraĵon, dancante sur siaj pintaj ungoj.

Estis tre hele super la kastelo de la kavaliro. Oni donis feston en la granda korto, kaj la bruoj de malproksima muziko atingis la oreilon.

La Diablo estis apud Macha. Li fiksas sur ŝi siajn fajrajn okulojn.

Ŝi diris mallaŭte, tiel mallaŭte, ke estas necese havi orelojn de la malamiko por aŭdi: "Prenu ŝin!"

Por ke ŝi ne vidu la krimon, ŝi kaŝis sian kapon en sia antaŭtuko.

“Ne timu, sed rigardu, mia belulino.”

Macha malkovris la kapon. La korpo de la patrino estis nur fleksebla bastoneto.

Al tiu ĉi la Diablo alfiksis la longajn orajn harojn de la patrino. Tiu estis la arĉo.

Li pasigis tiun arĉon sur la fadenoj, premis la ŝlosilojn por helsonigi la tonojn, kaj ludis. Tiam Macha povis rekonii la surdan ritmon de la kvar hakiloj, kiuj diris: “Kion vi faris al viaj fratoj?”

“Prenu tiun ĉi muzikilon,” diris Satano, “kaj marŝu trifoje ĉirkaŭ la kastelo, pasiganta la arĉon super la fadenoj, kiel mi jam faris. Vi estu feliĉega, fraŭlino mia!”

Macha tuj montis la deklivon de la monto. Ŝi alvenis apud la muroj de la kastelo, kaj komenĉis ludadi kaj promenadi ĉirkaŭe.

En granda ĉambro kuŝis la vunditan kavaliron sur lito. Li estis tre pala. Dum la lasta ĉaso li vundiĝis de la dentegoj de sovaĝa porko. Tuj kiam li aŭdis la aman voĉon de nekonata muziko, li sin levis el la lito.

Macha finis la unuan ĉirkaŭ-iron.

La kavaliro, forgesante sian vundon, vestigis dum ŝia dua ĉirkaŭ-iro. Li motis sur sin ĉiujn la ornamaĵojn, kiujn li havis en la kastelo, kaj, kiam li kolektis sian tutan riĉecon, li malfeliĉigis pro sia malriĉeco.

La muziko fariĝis tiel moviga, ke la kavaliro portis la manon al la koro.

Mi ne sentas plu la doloron de mia vundo, sed mi sentas bone, ke mia koro estos ĉiam malsana, se mi trovos (ksterne nur la venton; li diris al si mem.

Kaj li malsupreniris la grandan ŝtonan stuparon.

Macha finigis la trian ĉirkaŭ-iron.

La kavaliro trakuris la ponton, kaj sin ĵetis sur genuoj antaŭ Macha. Ŝi forgesis ĉion: patron, fratojn, patrinon.

“Ne donu al mi viajn riĉaĵojn,” ŝi diris. “Mi nur deziras vian koron! Kial ĝi estis necese uzi la muzikon de tiuj ĉi fadenoj por ke vi amu min?”

“Ho, tiu ĉi muziko, kiu transportas min! Oni dirus ke estas homaj voĉoj, kiuj parolas.”

Kaj ili ambaŭ eniris en la kastelon, kaj vivadis kune dum multaj feliĉaj tagoj.

De tempo al tempo la kavaliro estis maltrankvila. Li sentis sin kvazaŭ ensorĉata. Li deziris scii, kia estas la diabla povo de la eksterordinara muzikilo. Li suspektis ke Macha kaŝis de li grandan misterion. Li vane demandis ŝin pri tio. Ŝi ĉiam silentigis lin per kisoj. Ifoje la violonaj plendoj estis tiel ŝirantaj, ke li deziris forkuri, kaj komenci denove la antaŭan vivon. Sed preskaŭ tuj la kantado de la violono fariĝis tiel dolĉa, ke li ĉion forgesis—la mondon, siajn amikojn, siajn servistojn, la bestojn de la arbaro, ĉion, krom la sopiroj de tiu ĉi demona muziko.

Macha estis iom ĵaluza de la violono, kiu havis sur ŝia Henriko pli da potenco ol posedis ŝia propra beleco. Ofte ŝi estis tentinta rompigi la sonorajn kesteton kontraŭ ŝtonego. Sed ŝi timis perdi la Henrikan amon. Ŝi forgesis sian patron, siajn fratojn, sian patrinon, kaj ŝi fordonis sin al sia pasio.

Unu vesperon, iu frapis al la pordo.

Pluvigis. Kiu povas veni je tia horo?

Macha timegis. Homo eniris, kovrata per dika mantelo.

“Bonan vesperon, miaj amikoj,” diris la nekonata, demetanta sian ĉapelon.

Macha rekonis la voĉon, kaj ekkriis: “Henriko, la Diablo!” kaj ĵetis sin en liaj brakoj.

Satano ridis, kaj prenis la amantojn sub siaj brakoj, kiel pajlaro.

La violono restis en la dezerta kastelo.

Unu tagon, cigano, kiun la okazo kondukis tien, serĉis kuŝejon inter la ŝtonoj por sin ripozi. Li trovis la violonon, kaj prenis ĝin.

Malsuprenirinta en la valon, li ludis en la vilaĝojn. Viroj, infanoj, virinoj sekvis lin. Laŭ sia deziro, li plorigis kaj ridigis ĉiujn.

Tia estas la legendo pri la unua violono, kiel ĝin rakontas la ciganoj en Transilvanio.

## ŜTONIGITA ARBARO. (J. Heath (8723)).

Iam, Anglo kaj Amerikano interparoletis kune, pri la diversaj mirindaĵoj de iliaj patrujoj. La Anglo fiere parolis pri la belececo de la “New Forest,” kaj rakontis multajn trajtojn de tiu belega regiono.

“Sed,” rimarkis la Amerikano, “vi ĵus devas vidi la arbarojn de mia lando—precipe la ŝtonigitan arbaron en mia ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj la arboj tie estas ŝtonigitaj—ĉiu branĉo—ĉiu branĉeto—ĉiu plej malgranda folio—bestoj, birdoj, ĉio estas tute

ŝtonigita. Kaj tiam, kiam mi laste tie estas, jen ĉasisto, kiu same estis ŝtonigita. Sia pafilo—ŝtonigita, la fumo—ŝtonigita, eĉ la kuglo el lia pafilo restis en aero ŝtonigita!”

“Haltu do!” ekkriis la Anglo, “nun mi estas vin elkaptanta—ĉar laŭ la leĝo de graveco tiu kuglo devis fali teren.”

“Ho! alilandulo, ne tiel rapide!” respondis la Amerikano, “ĉar mi certigas vin ke, je tiu okazo, la leĝo de graveco mem estis ŝtonigita.”

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

Pense mi forlasas la vilaĝon kiun mi ĝis nun priskribis, kaj, post iom longa fervoja veturado, alvenas al alia. Ĉe la stacidomo min renkontas iom rimarkiinda persono; la pastro kies mi estos gasto. Junulo li estis kuracisto kaj studiadis ĉe Londono kaj Parizo. Poste li vizitis Turkujon. Dum la milito inter la Nordaj kaj Sudaj Amerikaj Ŝtatoj li akompanadis la armeon kiel kuracisto. Multe li vojaĝadis. Tiam, fariĝinte pastro, dum kelkaj jaroj li vivis kiel misiisto ĉe la Indanoj. Nun, maljunulo, li estas pastro de ligna preĝejo en ligna vilaĝo, kaj loĝadas en ligna domo kies la dormoĉambroj estas eniritaj, sen pero de trapasejo, rekte de la salonoj. Klera kaj bone edukita li estas respublikano; firme kredas ke ĉiuj homoj estas absolute egalaj; tute malestimas fierecon pro raso; kaj neniam forgesas, ke li devenas mem de tre bona kaj antikva familio.

Nature oni supozas, ke la domo de tia homo ne estus tute ordinara, kaj vere oni trovas en ĝi iom strangan miksaĵon. En mia dormoĉambro, ekzemple, la tolo estas belega, ĉiuj la negrandaj objektoj el la plej bona speco, tamen kiel lavtablo mi uzis keston—per blankaj kurtenetoj boligitan, puran, kaj al mi tute ĉarman; sed, funde, keston kiu antaŭe, mi supozas, entenis sapon. La pastro klarigas ke, kiam oni ŝanĝas ofte sian domon, granda meblaro estas tute sen necesa kaj eĉ foje malkonvena.

La pastredzino ridetas. "Venu kun mi," ŝi diras, "kaj rigardu mian provizejon. Neniam en Anglujo vi vidis ion similan"; kaj, min kondukinte en la ĝardenon, ŝi montras al mi lignan kovrilon.

Mi ĝin levas kaj vidas enfosita en la tero grandan kvadratan lignan keston, en kiu kuŝas, aŭ pendas de hoko en la flankoj alfiksitaĵoj, diversaj manĝaĵoj. Tiajn kovrilojn oni okaze vidas en la Angla kamparo sur la buŝo de profunda puto.

"Ni ne havas kelojn," klarigas mia kondukantino, "kaj la vetero estas varmega. Ni ankaŭ devas ĉion gardi kontraŭ la atakoj de tiuj malgrandaj rabistoj, la blankaj formikoj, kiuj tuj kovrus per siaj korpetoj ian manĝaĵon, kiun oni estus lasinta en la domo. Eĉ per multaj kovertoj oni ne povas ion kaŝi de ili. Foje mi enfaldis kelkajn bulkegojn tiel preme en kovertoj ke mi pensis: 'Neeble estas ke eĉ la blankaj formikoj eniru tiun ĉi paketon.' Sed, ho, ve! Kiam mi ĝin malfaldis ĝi estis tute plene ĵa je la malgrandaj turmentetoj."

Sed eĉ en Anglujo ni havas niajn malagrablaĵojn. Foje ĉe iom malfrua horo mi revenis loĝejon, kaj

estante malsata serĉis mem la panon. Mi ĝin trovis en la manĝoĉambro sur flanktablo, kie estis lasinta ĝin la senzorgaj servistoj. Mi trovis sed mi ne manĝis! Eĉ nun mi sentas min vomema ree vidante tiun promenejon kaj paŝtejon de arego de grandegaj nigraj skaraboj. Ugh!!! Mi preferas la blankajn formikojn.

La pastrejo tute similas al multaj aliaj dometoj de tiu vilaĝo. Oni alvenas al ĝi de la vilaĝo sur ligna flankpromenejo de kiu ĝin apartigas kelkaj lignaj bariloj. Por eniri la ĝardenon oni malsupreniras malgrandan lignan ŝtupareton. La dometo, kiu havas nur unu etaĝon, staras ĝuste meze sur rektangula terpeco de du Ejkroj (= 81 da Hektaro) kaj ĉar ĝi estas altigita kelkajn futojn de la tero oni supreniras kelkajn aliajn ŝtupetojn por alveni al la balkono. Mi ĉiam pensadis ke estus granda plibonigo konstruigi kvazaŭ ponteton de la balkono al la flankpromenejo. La balkono etendiĝas la tutan longon de la antaŭa flanko de la dometo. Sur ĝin (la balkonon) rigardas la du salonoj kaj de ĝi la pordoj kondukas rekte en la salonojn. Alfiksitaĵoj al la pordo-kadroj estas retpordoj tiajn kiajn mi jam priskribis.

Enirante la pli grandan salomon, kiu estas lumigita per tri fenestroj oni rimarkas ĉe la malantaŭa flanko du pordojn, kiuj kondukas rekte al dormoĉambroj. Ĉe la dekstra flanko alia pordo donas aliron al la alia salono de kiu oni eniras la trian dormoĉambrojn kaj la kuirejon. Pordo de la kuirejo kondukas al la malantaŭa terpeco kiu enhavas la belegan provizejon, kiun mi ĵus priskribis.

Tie oni ankaŭ trovas ĉevalojn kaj veturilojn sed ŝajnas al mi ke la pastro posedas ĉevalon nur por ĝin prunte doni al la anoj de sia preĝejo. Se li mem deziras veturadi eble li prunte prenos la ĉevalon de najbaro, laŭ maniero de la *Oxford'a* subgradulo, kiu dezirante doni al mi tason da teo, ne povis trovi la tekruĉon. Li venigis la *Scout* (serviston).

"Karolos, kie estas mia tekruĉo?"

"Sinjoro A. ĝin prunte prenis, Sinjoro."

"Bone; Sinjoro B. ĵus estas elirinta. Iru, kaj prunte prenu la alian."

Por havi agrablan okupon mi entreprenis debaki unu el la arboj (restaĵoj de antaŭa arbaro) kiuj ankoraŭ troviĝas en la ĝardeno. Ili estis el speco *Katalpa* arbo enlanda en la Ŝtatoj kaj Japonujo.

Mi ne min montris tre rapida laboranto.

Eble la pastro estis prava dirante ke oni ne

kutime bezonas libron kaj seĝegon por dehaki arbon. Mi citis kontraŭ li la ekzemplon de kelkaj antikvaj lernejestroj kiuj kutimis antaŭ si starigi knabon, kaj ĉe la fino de ĉiu paragrafo de la libro kiun ili legadis doni al li grandan baton per vergo. Oni nur anstataŭigu por la vergo la hakilon, por la knabo la arbon kaj por la lernejestro min mem kaj oni tuj vidos kiel energie mi laboris.

Se mia metodo ne estas rapida, ĝi estas almenaŭ treege agraba, sed la gajno al la *laboranto* dependas ĉefe de la libro.

La pastredzino, kiam ŝi trovis ke mi estas infanamulo venigis, por min amuzi, multajn geinfanojn, kaj mi forlasos tiun ĉi memoraĵon kun bedaŭro, sentante tiel kiel se mi estis enmetinta en ĝian ingon violonon kies estas rompitaĵ la kordoj. Ha, se nur la arboj havus orelojn kiel ili amus la gajajn, klarajn, infanajn voĉojn kiuj tiel ofte sonadas inter iliaj malhelaj trunkoj!

Poste en Aŭstrio mi vidis ludon kiu memorigis al mi unu el tiuj, kiujn ludis la Amerikaj infanoj en tiu pastra ĝardeno.

Eble estos interese al la leganto noti la similaĵojn. Mi tial mallonge priskribos la ambaŭ.

La du ludoj estas:—(1). *Snake* (la serpento)—Amerika. (2). *Kreis Ball* (Pilko de Rondo)—Aŭstra.

(1). *Snake*.—Krom unu (la kaptanto) ĉiuj ludantoj sidas ringe kaj ĵetas unu al alia naztuketon. Tiu ĉi naztuketo *kune kun la kaptanto* reprezentas la serpenton kaj la nomo *snake* signifas aŭ la ludon, la kaptanton aŭ la naztuketon.

La kaptanto staras meze en la ringo kaj penas tuŝi per mano iun ludanton kiu suprensaltas la serpento (naztuketo) *ĉe la momento* kiam ĝi ankoraŭ iamaniere restas sur li. Tiu tuŝo eble reprezentas la mordeton de la serpento, kaj la ludanto mordetita fariĝas la nova kaptanto.

Sed ĉar serpento ne povas mordeti personon kiun ĝi ne tuŝas, kaj ĉar la *snake* (naztuketo) estas tre rapide saltigita plej ofte kiam la mano tuŝas la korpon, la serpento estas ĵus forsaltinta al alia ludanto. Kaj la kaptanto malsukcesas.

Kiam li forsaltigas ĝin ĉiuj ludanto ekkrias *snake*: kaj oni povas bone supozi ke la ludo ne estas tute senbrua.

Tiu ĉi estas *infana* ludo, sed la Aŭstraj ludantoj estis plenkreskuloj.

Tie ĉi ili *staris* ringe kaj anstataŭ naztuketo ĵetadis unu al alia grandan ledan pilkon kiu havis ledrimenon por faciligi la ĵetadon. La kaptanto ne penas tuŝi la ludanton sed la pilkon kaj, kiam li sukcesas, li kiu laste ĝin ĵetis fariĝas kaptanto.

Fundo la du ludoj estas tute samaj, tamen la lokoj kie mi ilin vidis estas apartaj pli ol kvin mil mejloj.

Multon mi povus skribi pri tiu pastrejo sed mi memoras kiamaniere gazeto foje priskribis feston kaj mi haltigas la plumon.

“La procesio,” diris la gazeto, “estis tre bela kaj pli ol du mejlojn je longo, tiel kiel estis ankaŭ la parolado de la ĉefa parolisto.”

Eĉ en parolado tia longo estas nepardonebla.

## BALO DE LA ENMASKIGITOJ.

Originalo de Jane Heatly, tradukita de D. H. Lambert, B.A. (1960).

Anatolo certe estis ĉarma individuo. Li portis veston el densa mallume-griza peltu miksitita kun bruno, helajn ruzajn okuletojn, kaj mienon tiel bonaniman, ke estis neeble timiĝi pri li.

Eble vi pensus, ke li estas mangemeta, ĉar, por diri veron, li estus ien irinta kaj ion ajn farinta por tranĉaĵo da pano kaj mielo!

Laŭ tiu ĉi priskribo mi estas certa, ke vi estos diveninta, ke Anatolo estis urso. Jes, Anatolo estis urso, kaj tiam, kiam la nuna rakonteto malfermiĝas, li estis la ĉefa aktoro el vojaĝanta bestaro, kiu foje haltis en Franca urbeto havanta nomon tre longan, pri kiu ne estas necese, ke ni rompu la kapon.

Sed, krom sia vidindeco, Anatolo estis vera klerulo. Li povis danci ĝigon (speco da kampara danco) kiel eble plej gracie—tio estas, laŭ urso! Kiam li tagmanĝis havante buŝ-tukon ligitan sub la mentono kaj trinkis unuglute botel-plenon da vino, la ravo de la vidantaro iĝis senfina.

Kelkfoje okazis, ke Anatolo foriris el sia kaĝo por promeneti memstare; unufoje li sin trovis sur la ĉefstrato de tiu ĉi speciala urbeto antaŭ domo brile lumigata, kaj el kiu eliris sonoj da muziko kaj dancado.

Ĝi apartenis al la Urbestro, kiu estis donanta Balon de Enmaskigitoj.

Nu, aŭdante la danc-muzikon, Anatolo sentis sin klinema ankaŭ ekdanci.

Li ĉiam kutimis danci ĉiufoje kiam li aŭdis muzikilojn.

Kun mieno serioza li supreniris la peronon, la porleĝoj subite malfermiĝis, kaj Lia Ursa Moŝto eniris!

Nu, ĉiuj sciis, ke S<sup>ro</sup> Ripaton, amiko de la Urbestro, estas ĉeestonta ĉe la balo cumaskigite kiel urso.

Estis ja intencite, ke ĝi estu la precipa vespera altiro, kaj alia amiko de la Urbestro volonte proponis preni sur sin la rolon de Urso-gardisto.



Okazis, ke tiu ĉi amiko estis neatendite malhel-pata apudesti, sed li promesis sendi unu kiel anstataŭulo, kiu tamen povas alveni nur malfrue.

Tial, kiam Anatolo marŝis en la ĉambregon, la tuta ĉeestantaro unuvoĉe ekkriis:—"Jen estas S<sup>ro</sup> Ripaton, kia bonega urso li fariĝis! Ĉu iam vidigis io, tiel perfekte farita!"

SinJORINO la Urbestrino alproksimiĝante donis al li koran manpremon, kaj afable demandis pri lia edzino!

Sed al komplimentoj kaj demandoj Anatolo egale respondis per profundaj blekoj, kiuj ridigis laŭtege ĉiujn. Neniām antaŭe oni ludis tiel admirinde la rolon de urso!

Oni proponis poste konduki Sinjoron Urson en manĝo-ĉambbron. Tuj kiam li englutis plad-plenon da kukoj kaj botel-plenon da vino *senhalte*, la mirego de liaj admirantoj estis senlima.

Dume, alvenis S<sup>ro</sup> Ripaton mem!

Li tre surprizigis trovante alian urson jam alveninta. "Tiu ĉi," li diris, "devas esti mia malnova konatulo Pierre. Li intencis antaŭiri min, ĉu vere? Neniu tamen povas ne ekvidi, ke li ne havas la plej malproksiman ideon kiel ursiĝi. Per mia honoro, mi neniām vidis ion malpli simila al urso! Nu, ne grave; mi regalos lin per leciono, kiun li ne estas forgesonta!"

Li alpaŝis al Anatolo, kiu lin salutis per amika bleko. S<sup>ro</sup> Ripaton reblekis responde tiel nature, ke estis necble decidi, kiu el la du plej bone ursiĝis, kaj tiam vizaĝo kontraŭ vizaĝo, ili komencis danci.

La vero min dirigas, ke tion farante Anatolo ne plene trafis sian celon. Liaj paŝoj ne estis nepre tiel firmaj, kiel ili devus esti. Efektive, la botel-pleno da vino igis kompatindan Anatolon tiel dormema, ke, post malmulte da minutoj, li ĉesis danci, kaj forsanceliĝis en kojnon, kie oni baldaŭ aŭdis lin laŭte ronkantan.

Je tiu ĉi mem momento S<sup>ro</sup> Barbichon, la posedanto de la bestaro, eniris, alveninte por serĉi Anatolon.

"Ha," pensis la Urbestro, "jen estas la persono, kiu estas aktonta kiel urso-gardisto, anstataŭ mia kara amiko." Li laŭte mallalte diris en la oreilon al S<sup>ro</sup> Ripaton, ke la kvazaŭa urso-gardisto ĉeestas, kaj ke li faru ĉion, kion la gardisto ordonos, ĉar tio tre pligrandigos la komunan amuzon.

Grandegan buŝumon kun ĉeno alligita oni rapide surmetis al S<sup>ro</sup> Ripaton, kaj lin triumfe kondukinte tra la balsalono, lin malsuprenirigis sur la straton.

"Kien en la mondo li min forkondukos?" pensis kompatinda S<sup>ro</sup> Ripaton; sed li ne kuraĝis diri parolon pro la timo, ke oni lin faru ridindaĵo sur la strato, pri kio li certe ne antaŭkalkulis.

Kun mirego kaj teruro li subite sin trovis enŝovita en feran kaĝon, kies elirejon oni tuj ŝloŝis kaj baris.

Ĝi estis preskaŭ malluma, kaj tra la krepusko aŭdigis la sonoj de malĝojigaj mugadoj! Iom post iom liaj okuloj ekkutimigis al la mallumo kaj li sciigis, ke li estas en kaĝo de sovaĝaj bestoj! En unu angulo kuŝis Leono, maljuna kaj sendenta—sed vera leono! en alia Lupo—malsovaĝa kaj humila, tamen—vera lupo!

S<sup>ro</sup> Ripaton ne povis plu ĝin elporti. Kriegante terure li deĵetis la urs-maskon, kaj malkovris sin al la miregigata gardisto, kiu kuris returnen al la kaĝo, pro lia kriego, tial ke S<sup>ro</sup> Ripaton, la amiko de la Urbestro, estis leĝulo la plej honorinda en la urbeto.

"Sed kie," demandis la malfeliĉa gardisto, ellasante S<sup>ro</sup> Ripaton, kun multaj esprimoj de bedaŭro kaj malĝojo, "kie estas mia urso? Kie estas Anatolo?"

"Via urso," rediris S<sup>ro</sup> Ripaton, "Anatolo! Ha! mi nun komprenas, Anatolo do estas la dua!"

## LA LEONO KAJ LA KULO.

Tradukita de A. Motteau.

"For de ĉi tie, elpuraj' de l' tero,  
 "Insekta mizerero!"  
 Leono tiel al la kulo diris.  
 Ĉi tiu kontraŭstaris la bestegon,  
 Kaj tuj ĝi fiereme militiris:  
 "Ĉu pensas vi ke timas mi sonegon  
 "De brua kvarpieda blekegulo?  
 "Titolo reĝa taŭgas ne por kulo!  
 "Ol vi pli dika eĉ la bovo estas,  
 "Kaj ĝia paco kun mi tute restas."  
 Dirinte tion, kulo trumpetadis,  
 Leonon ĉirkaŭflugis kaj pikadis  
 Ĉi tie, kaj tie,  
 Kaj ie, kaj ĉie! . . .

Blekege nun la forta besto ŝaŭmas . . .  
 Je timo, ĝin vidante, homoj tremas!  
 Kaj tia humileg' de grandegulo  
 Elvenas nur el la mizera kulo.  
 Nek dento, nek unego kapti povas  
 L' insekton malamikan.  
 Leonon la fortikan  
 La kulo fine batas, kaj nun blovas  
 Trumpete ĝian gloron.  
 Ne longe tamen daŭras la vantaĵo:  
 Ĝi zume flugas ĝis araneaĵo,  
 Kaj tie kulo trovas ne honoron  
 Sed lastan horon.

## EKSTERDOMA INSTRUADO.

Artikolo el "The Sunday Chronicle," tradukita kun permeso de la Redakcio de Thos. Hoskison, Esperantisto 7312.

Estis tempo en la historiode tiu ĉi nacio (Anglujo) kiam, pro la manko de sistemo de deviga edukiteco, malmulte, tre malmulte da junuloj estis instruataj en la malsatata librolernado, kaj ilia instruado estis rektigata al la ĉefaj artoj kiel tiuj tiam estis komprenitaj. Poste alvenas tempo kiam infanoj estis sendataj al lernejoj, kaj instruataj preskaŭ tute el libroj; kaj en tiu tempo la longeco de la rivero Ganges, la alteco de Monto Everest kaj la nombro de la loĝantaro de la urbo Meksiko estis juĝataj faktoj pli urĝe gravajn ol ĝusta kompreno de la leĝoj de la naturo, nune ni reiras kaj plektas la metodojn pasintajn kune kun la lasta sistemo. La ĝardenlernejo estas la fasono de la nuntempo.

Ĝi estas antikva, tre antikva ideo. Antaŭ du mil kvincento da jaroj Persaj knaboj estis instruataj en la elementaĵoj de terkulturado kaj de ĝardenkulturado en ĝardenlernejoj. Sed ĝi ne devige estus malsatata pro sia antikveco, kaj estas profitoj en ĝia moderna aplikado kiuj ĝin taŭgigas je akcepto kaj etendado. Antaŭ dek aŭ dekdu jaroj la Surrey County Council (Surreja Graflanda Estraro) komencis kiel pioniro en la antaŭenigo de tiu ĉi plej interesa projekto. Ili decidis "instrui knabojn pri la principoj kaj praktikado de la sukcesa kulturado de dometa-ĝardeno aŭ 'allotment.'"

Oni sentis ke tia edukiteco estus tre utila en lokoj kie urbaj distriktoj kaj la kamparo apudiĝas, kaj ke, kiel ĝi estas edukiga kaj praktika kaj elkondukas kapablaĵojn de observado, ĝi kapabligus multajn knabojn por kampara vivado kiuj alie migrus al urboj nehavante la ecojn necesajn por laboro tie. La elementa edukada sistemo ŝajne forlogis knabojn for de praktika kontakto kun la tero ĝis kiam ili fariĝis tro maljunaj kaj, kvankam ne estis esperate aŭ dezirate ke ĉiu lernanto, tiel instruita, fariĝus lerta kaj metiista ĝardenisto, estis juĝate ke donante al knaboj intereson en kamparaj okupaĵoj, ĝi ne nur elkondukus iliajn kapablaĵojn sed ilin dotus per novaj rimedoj; kaj helpus al ili pligrandigi la fruktodonecon de la tero. Sr Wright, bone konata ĝardenkulturisto, kiu estis elektita kiel la ĉefinstruisto por ĝardenkulturo de la estraro, prenis sur sin la aferon, kaj terpeco, taŭga por la celo, estis akirita kaj disdividita en malgrandaj ĝardenoj. Estas nune pli ol 300 da tiaj ĝardenoj en la graflando, kaj ili estas kulturataj, sub observado, de knaboj kiuj iras lernejon tage aŭ vespere. La iloj estas provizataj

de la estraro, kaj malgranda parto de ĉiu terpeco kiu mezuras 30 futojn × 9 futoj estas rezervita por floroj. La rikolto apartenas al la kulturistoj mem, kaj la knaboj montris tian intereson en la laboro ke efektive rimarkindaj rezultatoj estis atingitaj.

En urbo Hale la tero kiu estis luata estis ŝtone-taĵa budo, kaj estis unue netaŭga por la celo. Sed la leciono estis tute pli fortiga tial ke ĝi montris tion kio povus esti farata en la plej malfavoraj cirkonstancoj, alpreninte la pravajn metodojn. En la unua jaro la ĝardenoj produktis rikoltojn valorajn ĉirkaŭ po 4s. 8d. ĉiu kio montris perdon ĉe la elspezo por materialoj po £2 13s. 4d. la *acre* (unu ejkro = 40.46 hektaro); sed kun tempo la frukto doneco de la tero kaj la lerteco de la kulturistoj pligrandigis kaj nun ĝenerala taksado po 10s. ĉiu ĝardeno montriĝas aŭ gajno super elspezo po £40 la ejkro, plimultigo de 113%. Kelke da ĝardenoj efektive montras profiton de 13s. 4d. aŭ gajnon po £64 la ejkro. La plej bonaj ĝardenoj montras profiton po £80 la ejkro, la elspezo estante po £40 kaj la enspezo po £120 la ejkro. La knaboj gajnis multon je ĝenerala scio, je observado, je praktika lerteco, kaj tiel la progreso de teoria edukado pli faciligis.

Multaj aliaj graflandaj estraroj sekvis la saman planon kaj estas nune granda nombro da ĝardenlernejoj kiuj simile estas sukcesaj. Ĝardenkulturado estas nun rimarkinda fako de edukado en "truant" kaj "industrial" lernejoj ĉar ĝi inklinigas al praktikeco la spiritojn de la knaboj multe da kiuj migras al Kanado kie ili progresadas tre bone. La Amerikanoj frue rekonis la valoron de tiu ĉi sistemo, kaj en la Unuigitaj Ŝtatoj estis multaj ĝardenlernejoj. La sistemo ja fariĝis fiksa fako de Amerika instruado kaj estas ĝenerale kredate ke la edukada valoro de tia instruado estas tre granda. Dum la ĝardena instruado la knaboj ankaŭ akiras scion pri tiaj objektoj kiel mensuracio, desegnado, librotenado, meteorologio kaj komercaj metodoj.

La unua ĝardenlernejo en Ameriko komenciĝis en Boston antaŭ dekkvin jaroj kaj ĝi unue celis altiri la infanojn al la kulturado de sovaĝaj floroj. Poste aldoniĝis granda ĝardeno por legomoj kaj nune en Boston estas dekses tiaj institucioj.

En New York la sistemo komenciĝis sur peco da senkultura tero uzata por forĵetado de rubo, k.t.p. Ĝi estas kovrita per ĉifonoj, pecetoj ĉiu specaj kaj

rompitaĵ boteloj, sed tamen sinjorino alkondukis al ĝi nombrojn da infanoj kiuj formovis la forĵetajon. La urbaj laboristoj alprenis al si la ideon kaj plugis kaj erpis la terpecon. Poste palisaro estis konstruita ĉirkaŭ ĝi. Aleoj estis faritaj kaj ĝardenoj estis desegnitaj. Semoj estis ricevitaj kaj ĝardenisto instruis dudek kvin infanojn kiel ili devus komenci. La rezultato estis baldaŭ vidata, kaj la ideo fariĝis tiel populara en New York kiel en Boston. La *Philadelphia Vacant Lots Cultivation Association* (Filadelfia Asocio por la Kulturado de senkulturaj terpecoj) sekvas la saman vojon, ĉiu infano kulturante unu pecon kaj ĉiuj kune kulturante komunan ĝardenon. Hejmo por knabinoj tie havas sian ĝardenon kaj sepdek knabinoj havante de ses ĝis dek ses jarojn elprenis el ĝi rikoltojn valorajn £1,600 je elspezo de £832 montrante profiton de £776 por la hejmo. La sistemo estas subtenata pro la grandega nombro da neskribitaj lecionoj je kiuj la lernantoj estas instruitaj, ĉar kiel la Amerikanoj diras: "Naturo paroladas."

Germanujo ankaŭ sekvas la saman vojon. Lastan jaron la Berlina estraro decidis fondi tagan lernejon en la abia arbaro apud Charlottenburg; sur la ĉirkaŭaĵo de la urbo. Sidu estis pretigita

kaj la faligitaj arboj fariĝis lignaĵo por la konstruaĵoj kaj la meblaĵoj de la lernejo.

Poste 150 geknaboj de la urboj estis kondukataj al ĝi el la popolaj lernejoj. Post la matenmanĝo du horoj da instruado laŭ la kutimaj reguloj komencas la taga laboro. Tiam dum du horoj la ĝejunuloj vagas en la arbaretoj la instruistoj dume sciigas ilin per komentario pri la objektoj vidataj, per paroladetoj pri natura historio, pri la kutimoj kaj la uzadoj de insektoj, birdoj kaj aliaj vivantaj objektoj, pri la kreskado de arboj kaj kreskaĵoj kaj iliaj roloj en la servo al la mondo. Sed la ideo unue estas alprenita por venigi iom da pli dolĉaj influoj en la vivadon de tiuj ĉi urbaj infanoj, por plibonigi ilin fizike kaj spirite, kaj por vivigi ilin inter ĉirkaŭaĵoj ne kutimaj.

"Avina legfarado" ni aŭdos, sed kredeble la lecionoj kiujn ellernas la ĝejunuloj estos pli profitaj al ili en plimatura aĝo ol scio de la longeco de la rivero Rhein kaj de la jaro kiam mortis Nero. La sistemo estis tute sukcesplena kaj ĝi disvastiĝos.

<sup>1</sup> Al tiuj lernejoj oni sendas la malobeemajn kaj malbonajn geknabojn.

## HUNDAJ RIMARKOJ PRI LA DOMSERVISTA PROBLEMO.

Originale verkita de Clarence Bicknell.

Ke la riĉuloj plendas, mi tre ofte aŭdis,  
Servistojn kontentigajn ne trovinte;  
Sed mi, nur hundo kaj malriĉa, ĉiam laŭdis  
La miajn, ilin ĝis nun ne ŝanĝinte.

De mia hundeteco tri mi havis ĉiam,  
Sinjoron, kun edzino kaj filino;  
Fidele ili min servadis, kaj neniam  
Mi plendis pri kondukt' aŭ disciplino.

Unue la filino, per invito,  
Kun mi ludadis, kombis mian felon,  
Min lavis, kaj vespere portis min al lito,  
Eĉ karesante sian hundanĝelon.

Ŝi, kiel bona servistin', pri mia sano  
Pensadis de mateno ĝis vespero;  
Ŝi donis al mi lakton kun buteropano,  
Kaj kelkafoje pecojn da sukero.

Mi posttagmeze la patrinon veturile  
Kondukis al la urbo aŭ butikoj,  
Kaj dum ŝi pensis pri aferoj, mi trankvile  
Dormadis aŭ blekadis kun amikoj.

Ŝi sin okupis pri la domo, pri manĝadoj,  
Aŭ pri leteroj, libroj, higieno;  
Sed mi amuzis min per belaj promenadoj,  
Kurante en la kampoj aŭ ĝardeno.

La viron ankaŭ mi ne volis sola lasi;  
"Nun venu al rivero, al herbejo."  
Mi ofte diris, "Kaptu fiŝojn, iru ĉasi,  
Alportu ion al la kuirejo."

Por mi biskviton, panon, havis li, aŭ oston,  
Kaj dum mi manĝis, trinkis aŭ banigis,  
Laboris li, kaj, ĉar mi portis nur la voston  
Sed li pafilon pezan, li laciĝis.

Sed nun estante dekdujara, kaj maljuna,  
Mi dormas je l' somero sub la fagoj,  
Aŭ kuŝas je l' aŭtuno ĉe florejo suna,  
Kaj ĉe la fajro dum la vintraj tagoj.

Sed mi memoras tre dankeme ĉiutage  
Ke bona estis mia hunda sorto;  
Servistojn mi fidelajn havis, eĉ senpage,  
Kaj ili min servados ĝis la morto.

## PLUVO.

De Dorosievic, tradukita (el la Bulgara) de Penko Petrov (Jalta).

La ĉiela filo, lia nomo travivu la universon, imperiestro Li-O-A staris apud fenestro en sia porcelana palaco.

Li estis juna tial bona. Post la lukso kaj brilego li ne ĉesis pensi pri la malriĉuloj kaj malfeliĉuloj.

Estis pluvo. Larmaroj fluadis, ploradis la ĉielo, arboj kaj floroj faligadis larmojn post ĝi.

Enuo turmentadis la koron de la imperiestro kaj li ekkriis:

“Bedaŭrindaj tiuj, kiuj en pluvo ne havas eĉ ĉapon sur la kapo,” kaj turniĝante al sia ĉambelano li diris:

“Mi volus scii kiom da tiaj malfeliĉuloj estas en mia Pkingo.”

“Lumo de la suno!” diris, genufleksante kaj kapklinigante Tzung-Ĥi-Tzang, “Ĉu estas io neebla al la ordonantulo al la reĝoj? Eĉ antaŭ la suno malaperos, Vi scios, patro de la aŭroro, tion ĉi, kio estas kompleza al Vi.”

Kaj la imperiestro ridetis bonkore, kaj Tzung-Ĥi-Tzang tuj iris, uzante sian tutan forton, ĉe ĉefministro San-Ĉu-San.

Li alvenis lacigspire kaj rapide, eĉ ne sukcesis fari ĉiujn respektojn, kiujn oni donas al ĉefministro.

“La ĝojo de la universo, nia plej afabla ordonanto (premiĝante, li parolis) estas en terura maltrankvileco.

Lin maltrankviligas tiuj ĉi, kiuj iras dum pluvo sen ĉapoj en nia Pkingo, kaj li deziras scii eĉ hodiaŭ, kioma estas ilia nombro!”

“Jes, ekzistas tiaj sentaŭguloj!” respondis San-Ĉu-San. Kaj li ordonis, ke oni alvokigu la urbestron Paj-Ĥi-Vo.

“Malbonaj novaĵoj de la palaco,” diris li al ĵus enirinta Paj-Ĥi-Vo, kiu por esprimi atenton klinigis sian kapon. “La posedanto de nia vivo rimarkis malordon!”

“Kiel!” terure ekkriis Paj-Ĥi-Vo. “Ĉu jam ne estas apud la palaco la ĝardeno enombrita, kiu ĉarmas Pekingon je la okuloj de la bogdihano?”

“Mi ne scias bone, kiel okazis tio ĉi,” respondis San-Ĉu-San, “sed Lian Moŝton terure maltrankviligas la sentaŭguloj kiuj iradas dum pluvo sen ĉapoj. Li deziras scii eĉ hodiaŭ kiomaj estas ili en Pkingo. Vi ordonu!”

“Vi alvokigu, por ke venu ĉe mi, tuj, tiu ĉi maljuna hundo Ĥuar-Dzung!” kriadis post minuto Paj-Ĥi-Vo al siaj subuloj.

Kiam la estro de la urba patrolo, paliĝinta de teruro tremante falis inter liaj piedoj, la mandarino elfluigis sur li falakvon de malbenoj.

“Fripono, sentaŭgulo, malnobla perfidulo! Vi volas, ke ili diahaku nin ĉiuj kune kun vi, en pecoj!”

“Klarigu al mi la kaŭzon de via kolero”—parolis treminta de timo apud la piedoj de la mandarino, Ĥuar-Dzung—“por ke mi povu kompreni la konsolantajn vortojn, kiujn vi parolas al mi; alimaniere, mi timas, ke mi ne povos kompreni la lingvon de via saĝeco.”

“Maljuna hundo, kiu devus gardadi ie porkan aron, sed ne la plej grandan urbon en la tuta mondo! La reĝo Ĥina mem estas rimarkinta, ke en la urbo ekzistas senordo—sur la stratoj vagas sentaŭguloj, kiuj eĉ dum pluvo ne havas ĉapon por ĝin meti sur kapo. Vesperon ankoraŭ vi sciigu min, kiom da tiaj sentaŭguloj estas en Pekingo!”

“Ĉio precize estos plenumita!” respondis Ĥuar-Dzung, ekbatinte sian frunton tri fojojn sur la plankon.

Post kelke da minutoj li murmuregis kaj frapadis per piedoj sur la kolektitaj policanoj.

“Brutoj el kiuj mi pendigos la duonon, por ke mi povu vivajn bruligi la ceterajn! Tiel vi observadas la urbon? Dum pluvtempo iuj sentaŭguloj estas irintaj sen ĉapoj! Ĉiuj estu elkaptitaj post horo (la Ĥina horo = 40 minutoj), alimaniere la diabloj vin prenos.”

La policanoj iris plenumi la ordonon—dum unu horo sur la stratoj de Pekingo ekzistis efektiva ĉaso.

“Nu kaptu lin! Kaptu lin!” kriadis la policanoj, persekutante la homojn, kiuj nehavis ĉapojn.

Ili eltiris ilin sub la bariloj, sub la pordoj de la domoj, kien ili estis kaŝiĝintaj.

Post horo sen unu minuto, ĉiuj en Pekingo, kiuj ne havis ĉapojn sur siaj kapoj, staris en la korto de la malliberejo.

“Kiomaj ili estas?” demandis Ĥuar-Dzung.

“Dudek mil okcent sepdek unu!” respondis la policanoj, kliniĝante eĉ ĝis la tero.

“La mortigistoj tuj aperu!” ordonis Ĥuar-Dzung.

Kaj post duono da horo 20,871 senkapigitaj Ĥinoj kuŝadis en la korto de la malliberejo.

20,871 da kapoj estis metitaj sur ponardegoj kaj disportitaj el la urbo por saĝigado de la popolo.

Ĥuar-Dzung iris raportadi al Paj-Ĥi-Vo; Paj-Ĥi-Vo al San-Ĉu-San; kaj San-Ĉu-San sciigis al Tzung-Ĥi-Tzang.

Mallumigis. La pluvo ĉesis. Blovadis venteto, kiu disbalancigadis la arbojn, kaj la pluverojn,

lumaj kiel rubenoj, faladis sur la bonodoraj floroj, kiuj fajerigis kaj bruligis, lumigitaj per la radioj de la malaperiganta suno.

Per brilego kaj bonodoro estis plena la reĝa ĝardeno. La filo de la ĉielo, Li-O-A, staris apud la fenestro en sia porcelana palaco kaj raviĝis de la mirinda vidaĵo.

Sed juna kaj bona, li eĉ en tiu ĉi minuto ne forgesis la malfeliĉulojn.

Ĝokaze diris li, turniĝante al Tzung-Ĥi-Tzang:

“Vi volis sciigi min, kiom da anoj en Pekingo nehavas ĉapojn por kovri siajn kapojn dum pluvo.”

“La deziro de la tutmonda posedanto estas plenumita per liaj servistoj!” respondis per malaltan riverencon Tzung-Ĥi-Tzang.

“Kiomaj ili estas? Nur diru al mi la veron!”

“En tuta Pekingo ekzistas jam ne unu Ĥino, kiu nehavas ion por kovri sian kapon dum pluvo. Mi juras, ke mi diras la veron!”

Kaj Tzung-Ĥi-Tzang levis siajn manojn, kaj klinigis sian kapon—signo de sankta juro.

La vizaĝo de bogdihano lumigis per ĝoja, feliĉa rideto.

“Feliĉa urbo! feliĉa lando!” ekkriis li. “Kiel mi estas feliĉa, ke sub mia potenco tiel bone vivas la popolo.”

La ĉiuj ĝepalacanoj, vidante ke la bogdihano ĝojas, ekĝojis kune.

Kaj San-Ĉu-San, Paj-Ĥi-Vo kaj Ĥuar-Dzung ricevis la ordenon “*La ora Drakono*” pro siaj patrujaj zorgoj al la popolo.

## LA KONSCIENCO MALKURAĜIGAS ĈIUJN.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Antaŭ pli ol cent jaroj, niaj landanoj estis tre superstiĉaj, kaj eĉ la loĝantoj en nia vilaĝeto timis, kiam oni parolis pri fantomoj.

Ned Saunterer, la heroo de tiu ĉi rakonto, loĝis en proksima urbo, kie antaŭe estis nur malmultaj domoj, sed kiu nuntempe estas grandega kaj prospera urbo.

Dum kelkaj jaroj Ned laboris ĉe porcelana fabrikejo, sed li preferis vivon pli libera. Li tial aĉetis fajencajn komercaĵojn kaj vendis ilin en proksimaj kvartaloj.

Tiu ĉi metio prosperis kaj li baldaŭ povis aĉeti azenon por porti la komercaĵon kamparen.

Multe da friponaĵo ekzistis dum la priskribata periodo, kaj ne estis eksterordinara okazo, kiam oni haltigis vojaĝantojn sur la vojo, kaj rabis ilin.

La loĝfako malofte sin intermetis pri tiaj aferoj kaj oni ofte decidis malpacojn per la “du pugnoj.”

Por protekti sian komercaĵon kontraŭ tiuj ĉi ŝtelistoj, kiam li vojaĝis nokte, Ned alligis ĉenon al la kruro de la azeno, kaj ankaŭ surmetis sur ĝia kapo kovraĵon iom similan al du grandegaj kornoj. Tia estis la kredemo inter la vilaĝanoj pri supernaturaj estaĵoj ke, kiam oni aŭdis la tintadon de la ĉeno kaj vidis strangan nekonatan beston tra la mallumo oni ĝin kredis esti la diablo, kaj forkuris kiel eble plej rapide.

Nia vilaĝeto tiampe konsistis el malmultaj unuopaj dometoj kaj unu preĝejo. Unu el tiuj ĉi dometoj enhavis, oni diris, fantomon, kaj neniu volis tie loĝi.

Post kelkaj monatoj du strangaj viroj alvenis, kaj, malgraŭ la fantomo, luis la dometon.

Ili tamen ne estis ŝatataj de la najbaroj, kaj oni ilin rigardis kiel suspektuloj. Ili posedis ĉevaleton kaj ŝarĝoveturileton, sed ŝajnis al ĉiu ke ili neniam uzis ĝin.

Tiampe, ĉe multaj Anglaj vilaĝetoj, homoj ofte kontraŭleĝe elterigis la mortintojn el la preĝejkorto, kaj vendis la ostojn.

Al tiu ĉi metio apartenis la du viroj.

Unu mallumegan kaj ventegan nokton, ili eniris la preĝejkorton, kun la ĉevaleto, ŝarĝoveturileto kaj fosiloj, kaj komencis malfermi unu el la tomboj.

Nia amiko Ned ankaŭ veturis frumatene al malproksima urbo kaj, revenante, li perdis la vojon. Post kelkaj horoj, li trovis sin apud nia vilaĝa preĝejo, kaj la azeno vagis al la preĝejkorto. Malgraŭ la ventego, la du homoj en la tombo jam ekaŭdis la supernaturan sonon de la ĉeno alligita al la kruro de la azeno, kaj unu el ili, subite suprenrigardinte, vidis tute apude ion, kion li kredis esti terura korna diablo.

Kun laŭta kriego la du viroj suprenrampis el la tombo, kaj rapide malaperis en la mallumo.

Kiam Ned komprenis kio okazis, li ĝojis pro sia bonŝanĉo, kaj, sen ia konscienduboj, tuj posedigis je la ĉevaleto kaj ŝarĝoveturileto, kaj uzis ilin por veturigi sian komercaĵon.

La du viroj neniam revenis por demandi siajn posedaĵojn, ĉar ili timis la leĝan punon, kiu atendas ĉiujn korpoŝtelistojn.

## PLUVO.

De Dorosievic, tradukita (el la Bulgara) de Penko Petrov (Jalta).

La ĉiela filo, lia nomo travivu la universon, imperiestro Li-O-A staris apud fenestro en sia porcelana palaco.

Li estis juna tial bona. Post la lukso kaj brilego li ne ĉesis pensi pri la malriĉuloj kaj malfeliĉuloj.

Estis pluvo. Larmaroj fluadis, ploradis la ĉielo, arboj kaj floroj faligadis larmojn post ĝi.

Enuo turmentadis la koron de la imperiestro kaj li ekkriis:

"Bedaŭrindaj tiuj, kiuj en pluvo ne havas eĉ ĉapon sur la kapo," kaj turniĝante al sia ĉambelano li diris:

"Mi volus scii kiom da tiaj malfeliĉuloj estas en mia Pekingo."

"Lumo de la suno!" diris, genufleksante kaj kapklinigante Tzung-Ĥi-Tzang, "Ĉu estas io neebbla al la ordonantulo al la reĝoj? Eĉ antaŭ la suno malaperos, Vi scios, patro de la aŭroro, tion ĉi, kio estas kompleza al Vi."

Kaj la imperiestro ridetis bonkore, kaj Tzung-Ĥi-Tzang tuj iris, uzante sian tutan forton, ĉe ĉefministro San-Ĉu-San.

Li alvenis lacigspire kaj rapide, eĉ ne sukcesis fari ĉiujn respektojn, kiujn oni donas al ĉefministro.

"La ĝojo de la universo, nia plej afabla ordonanto (premiĝante, li parolis) estas en terura maltrankvileco.

Lin maltrankviligas tiuj ĉi, kiuj iras dum pluvo sen ĉapoj en nia Pekingo, kaj li deziras scii eĉ hodiaŭ, kioma estas ilia nombro!"

"Jes, ekzistas tiaj sentaŭguloj!" respondis San-Ĉu-San. Kaj li ordonis, ke oni alvokigu la urbestron Paj-Ĥi-Vo.

"Malbonaj novaĵoj de la palaco," diris li al ĵus enirinta Paj-Ĥi-Vo, kiu por esprimi atenton kliniĝis sian kapon. "La posedanto de nia vivo rimarkis malordon!"

"Kiel!" terure ekkriis Paj-Ĥi-Vo. "Ĉu jam ne estas apud la palaco la ĝardeno enombrita, kiu ĉarmas Pekington je la okuloj de la bogdihano?"

"Mi ne scias bone, kiel okazis tio ĉi," respondis San-Ĉu-San, "sed Lian Moŝton terure maltrankviligas la sentaŭguloj kiuj iradas dum pluvo sen ĉapoj. Li deziras scii eĉ hodiaŭ kiomaj estas ili en Pekingo. Vi ordonu!"

"Vi alvokigu, por ke venu ĉe mi, tuj, tiu ĉi maljuna hundo Ĥuar-Dzung!" kriadis post malkinto Paj-Ĥi-Vo al siaj subuloj.

Kiam la estro de la urba patrolo, paliĝinta de teruro tremante falis inter liaj piedoj, la mandarino elfluigis sur li falakvon de malbenoj.

"Fripono, sentaŭgulo, malnobla perfidulo! Vi volas, ke ili diahaku nin ĉiuj kune kun vi, en pecoj!"

"Klarigu al mi la kaŭzon de via kolero"—parolis treminta de timo apud la piedoj de la mandarino, Ĥuar-Dzung—"por ke mi povu kompreni la konsolantajn vortojn, kiujn vi parolas al mi; alimaniere, mi timas, ke mi ne povos kompreni la lingvon de via saĝeco."

"Maljuna hundo, kiu devus gardadi ie porkan aron, sed ne la plej grandan urbon en la tuta mondo! La reĝo Ĥina mem estas rimarkinta, ke en la urbo ekzistas senordo—sur la stratoj vagas sentaŭguloj, kiuj eĉ dum pluvo ne havas ĉapon por ĝin meti sur kapo. Vesperon ankoraŭ vi sciigu min, kiom da tiaj sentaŭguloj estas en Pekingo!"

"Ĉio precize estos plenumita!" respondis Ĥuar-Dzung, ekbatinte sian frunton tri fojojn sur la plankon.

Post kelke da minutoj li murmuregis kaj frapadis per piedoj sur la kolektitaj policanoj.

"Brutoj el kiuj mi pendigos la duonon, por ke mi povu vivajn bruligi la ceterajn! Tiel vi observadas la urbon? Dum pluvtempo iuj sentaŭguloj estas irintaj sen ĉapoj! Ĉiuj estu elkaptitaj post horo (la Ĥina horo = 40 minutoj), alimaniere la diabloj vin prenos."

La policanoj iris plenumi la ordonon—dum unu horo sur la stratoj de Pekingo ekzistis efektiva ĉaso.

"Nu kaptu lin! Kaptu lin!" kriadis la policanoj, persekutante la homojn, kiuj nehavis ĉapojn.

Ili eltiris ilin sub la bariloj, sub la pordoj de la domoj, kien ili estis kaŝiĝintaj.

Post horo sen unu minuto, ĉiuj en Pekingo, kiuj ne havis ĉapojn sur siaj kapoj, staris en la korto de la malliberejo.

"Kiomaj ili estas?" demandis Ĥuar-Dzung.

"Dudek mil okcent sepdek unu!" respondis la policanoj, kliniĝante eĉ ĝis la tero.

"La mortigistoj tuj aperu!" ordonis Ĥuar-Dzung.

Kaj post duono da horo 20,871 senkapigitaj Ĥinoj kuŝadis en la korto de la malliberejo.

20,871 da kapoj estis metitaj sur ponardegoj kaj disportitaj el la urbo por saĝigado de la popolo.

Ĥuar-Dzung iris raportadi al Paj-Ĥi-Vo; Paj-Ĥi-Vo al San-Ĉu-San; kaj San-Ĉu-San sciigis al Tzung-Ĥi-Tzang.

Mallumiĝis. La pluvo ĉesis. Blovadis venteto, kiu disbalancigadis la arbojn, kaj la pluverojn,

lumaj kiel rubenoj, faladis sur la bonodoraj floroj, kiuj fajeriĝis kaj bruliĝis, lumigitaj per la radioj de la malaperiganta suno.

Per brilego kaj bonodoro estis plena la reĝa ĝardeno. La filo de la ĉielo, Li-O-A, staris apud la fenestro en sia porcelana palaco kaj raviĝis de la mirinda vidaĵo.

Sed juna kaj bona, li eĉ en tiu ĉi minuto ne forgesis la malfeliĉulojn.

Ĝokaze diris li, turnigante al Tzung-Ĥi-Tzang:

“Vi volis sciigi min, kiom da anoj en Pekingo ne havas ĉapojn por kovri siajn kapojn dum pluvo.”

“La deziro de la tutmonda posedanto estas plenumita per liaj servistoj!” respondis per malaltan riverencon Tzung-Ĥi-Tzang.

“Kiomaj ili estas? Nur diru al mi la veron!”

“En tuta Pekingo ekzistas jam ne unu Ĥino, kiu ne havas ion por kovri sian kapon dum pluvo. Mi juras, ke mi diras la veron!”

Kaj Tzung-Ĥi-Tzang levis siajn manojn, kaj klinigis sian kapon—signo de sankta juro.

La vizaĝo de bogdihano lumiĝis per ĝoja, feliĉa rideto.

“Feliĉa urbo! feliĉa lando!” ekkriis li. “Kiel mi estas feliĉa, ke sub mia potenco tiel bone vivas la popolo.”

La ĉiuj ĝepalacanoj, vidante ke la bogdihano ĝojas, ekĝojis kune.

Kaj San-Ĉu-San, Paj-Ĥi-Vo kaj Ĥuar-Dzung ricevis la ordenon “*La ora Drakono*” pro siaj patrujaj zorgoj al la popolo.

## LA KONSCIENCO MALKURAĜIGAS ĈIUJN.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Antaŭ pli ol cent jaroj, niaj landanoj estis tre superstiĉaj, kaj eĉ la loĝantoj en nia vilaĝeto timis, kiam oni parolis pri fantomoj.

Ned Saunterer, la heroo de tiu ĉi rakonto, loĝis en proksima urbo, kie antaŭe estis nur malmultaj domoj, sed kiu nuntempe estas grandega kaj prospera urbo.

Dum kelkaj jaroj Ned laboris ĉe porcelana fabrikejo, sed li preferis vivon pli libera, Li tial aĉetis fajencajn komercaĵojn kaj vendis ilin en proksimaj kvartaloj.

Tiu ĉi metio prosperis kaj li baldaŭ povis aĉeti azenon por porti la komercaĵon kamparen.

Multe da friponaĵo ekzistis dum la priskribata periodo, kaj ne estis eksterordinara okazo, kiam oni haltigis vojaĝantojn sur la vojo, kaj rabis ilin.

La leĝafako malofte sin intermetis pri tiaj aferoj kaj oni ofte decidis malpacojn per la “du pugnoj.”

Por protekti sian komercaĵon kontraŭ tiuj ĉi ŝtelistoj, kiam li vojaĝis nokte, Ned alligis ĉenon al la kruro de la azeno, kaj ankaŭ surmetis sur ĝia kapo kovraĵon iom similan al du grandegaj kornoj. Tia estis la kredemo inter la vilaĝanoj pri supernaturaj estaĵoj ke, kiam oni aŭdis la tintadon de la ĉeno kaj vidis strangan nekonatan beston tra la mallumo oni ĝin kredis esti la diablo, kaj forkuris kiel eble plej rapide.

Nia vilaĝeto tiatempe konsistis el malmultaj unuopaj dometoj kaj unu preĝejo. Unu el tiuj ĉi dometoj enhavis, oni diris, fantomon, kaj neniu volis tie loĝi.

Post kelkaj monatoj du strangaj viroj alvenis, kaj, malgraŭ la fantomo, luis la dometon.

Ili tamen ne estis ŝatataj de la najbaroj, kaj oni ilin rigardis kiel suspektuloj. Ili posedis ĉevaleton kaj ŝarĝoveturileton, sed ŝajnis al ĉiu ke ili neniam uzis ĝin.

Tiatempe, ĉe multaj Anglaj vilaĝetoj, homoj ofte kontraŭleĝe elterigis la mortintojn el la preĝejkorto, kaj vendis la ostojn.

Al tiu ĉi metio apartenis la du viroj.

Unu mallumegan kaj ventegan nokton, ili eniris la preĝejkorton, kun la ĉevaleto, ŝarĝoveturileto kaj fosiloj, kaj komencis malfermi unu el la tomboj.

Nia amiko Ned ankaŭ veturis frumatene al malproksima urbo kaj, revenante, li perdis la vojon. Post kelkaj horoj, li trovis sin apud nia vilaĝa preĝejo, kaj la azeno vagis al la preĝejkorto. Malgraŭ la ventego, la du homoj en la tomo jam ekaŭdis la supernaturan sonon de la ĉeno alligita al la kruro de la azeno, kaj unu el ili, subite suprenrigardinte, vidis tute apude ion, kion li kredis esti terura korna diablo.

Kun laŭta kriego la du viroj suprenrampis el la tomo, kaj rapide malaperis en la mallumo.

Kiam Ned komprenis kio okazis, li ĝojis pro sia bonŝanĉo, kaj, sen ia konsciencedubo, tuj posedigis je la ĉevaleto kaj ŝarĝoveturileto, kaj uzis ilin por veturigi sian komercaĵon.

La du viroj neniam revenis por demandi siajn posedaĵojn, ĉar ili timis la leĝan punon, kiu atendas ĉiujn korpoŝtelistojn.

## PLUVO.

De Dorosievic, tradukita (el la Bulgara) de Penko Petrov (Jalta).

La ĉiela filo, lia nomo travivu la universon, imperiestro Li-O-A staris apud fenestro en sia porcelana palaco.

Li estis juna tial bona. Post la lukso kaj brilego li ne ĉesis pensi pri la malriĉuloj kaj malfeliĉuloj.

Estis pluvo. Larmaroj fluadis, ploradis la ĉielo, arboj kaj floroj faligadis larmojn post ĝi.

Enuo turmentadis la koron de la imperiestro kaj li ekkriis:

“Bedaŭrindaj tiuj, kiuj en pluvo ne havas eĉ ĉapon sur la kapo,” kaj turniĝante al sia ĉambelano li diris:

“Mi volus scii kiom da tiaj malfeliĉuloj estas en mia Pekingo.”

“Lumo de la suno!” diris, genufleksante kaj kapklinigante Tzung Ĥi-Tzang, “Ĉu estas io neebla al la ordonanto al la reĝoj? Eĉ antaŭ la suno malaperos, Vi scios, patro de la aŭroro, tion ĉi, kio estas kompleza al Vi.”

Kaj la imperiestro ridetis bonkore, kaj Tzung-Ĥi-Tzang tuj iris, uzante sian tutan forton, ĉe ĉefministro San-Ĉu-San.

Li alvenis laciĝspire kaj rapide, eĉ ne sukcesis fari ĉiujn respektojn, kiujn oni donas al ĉefministro.

“La ĝojo de la universo, nia plej afabla ordonanto (premigiante, li parolis) estas en terura maltrankvileco.

Lin maltrankviligas tiuj ĉi, kiuj iras dum pluvo sen ĉapoj en nia Pekingo, kaj li deziras scii eĉ hodiaŭ, kioma estas ilia nombro!”

“Jes, ekzistas tiaj sentaŭguloj!” respondis San-Ĉu-San. Kaj li ordonis, ke oni alvokigu la urbestron Paj-Ĥi-Vo.

“Malbonaj novaĵoj de la palaco,” diris li al ĵus enirinta Paj-Ĥi-Vo, kiu por esprimi atenton klinigis sian kapon. “La posedanto de nia vivo rimarkis malordon!”

“Kiel!” terure ekkriis Paj-Ĥi-Vo. “Ĉu jam ne estas apud la palaco la ĝardeno enombrita, kiu ĉarmas Pekington je la okuloj de la bogdiĥano?”

“Mi ne scias bone, kiel okazis tio ĉi,” respondis San-Ĉu-San, “sed Lian Moŝton terure maltrankviligas la sentaŭguloj kiuj iradas dum pluvo sen ĉapoj. Li deziras scii eĉ hodiaŭ kiomaj estas ili en Pekingo. Vi ordonu!”

“Vi alvokigu, por ke venu ĉe mi, tuj, tiu ĉi maljuna hundo Ĥuar-Dzung!” kriadis post minuto Paj-Ĥi-Vo al siaj subuloj.

Kiam la estro de la urba patrolo, paliĝinta de teruro tremante falis inter liaj piedoj, la mandarino elfluigis sur li falakvon de malbenoj.

“Fripono, sentaŭgulo, malnobla perfidulo! Vi volas, ke ili diabhaku nin ĉiuj kune kun vi, en pecoj!”

“Klarigu al mi la kaŭzon de via kolero”—parolis treminta de timo apud la piedoj de la mandarino, Ĥuar-Dzung—“por ke mi povu kompreni la konsolantajn vortojn, kiujn vi parolas al mi; alimaniere, mi timas, ke mi ne povos kompreni la lingvon de via saĝeco.”

“Maljuna hundo, kiu devus gardadi ie porkan aron, sed ne la plej grandan urbon en la tuta mondo! La reĝo Ĥina mem estas rimarkinta, ke en la urbo ekzistas senordo—sur la stratoj vagas sentaŭguloj, kiuj eĉ dum pluvo ne havas ĉapon por ĝin meti sur kapo. Vesperon ankoraŭ vi sciigu min, kiom da tiaj sentaŭguloj estas en Pekingo!”

“Ĉio precize estos plenumita!” respondis Ĥuar-Dzung, ekbatinte sian frunton tri fojojn sur la plankon.

Post kelke da minutoj li murmuregis kaj frapadis per piedoj sur la kolektitaj policanoj.

“Brutoj el kiuj mi pendigos la duonon, por ke mi povu vivajn bruligi la ceterajn! Tiel vi observadas la urbon? Dum pluvtempo iuj sentaŭguloj estas irintaj sen ĉapoj! Ĉiuj estu elkaptitaj post horo (la Ĥina horo = 40 minutoj), alimaniere la diabloj vin prenos.”

La policanoj iris plenumi la ordonon—dum unu horo sur la stratoj de Pekingo ekzistis efektiva ĉaso.

“Nu kaptu lin! Kaptu lin!” kriadis la policanoj, persekutante la homojn, kiuj ne havis ĉapojn.

Ili eltiris ilin sub la bariloj, sub la pordoj de la domoj, kien ili estis kaŝiĝintaj.

Post horo sen unu minuto, ĉiuj en Pekingo, kiuj ne havis ĉapojn sur siaj kapoj, staris en la korto de la malliberejo.

“Kiomaj ili estas?” demandis Ĥuar-Dzung.

“Dudek mil okcent sepdek unu!” respondis la policanoj, klinigante eĉ ĝis la tero.

“La mortigistoj tuj aperu!” ordonis Ĥuar-Dzung.

Kaj post duono da horo 20,871 senkapigitaj Ĥinoj kuŝadis en la korto de la malliberejo.

20,871 da kapoj estis metitaj sur ponardegoj kaj disportitaj el la urbo por saĝigado de la popolo.

Ĥuar-Dzung iris raportadi al Paj-Ĥi-Vo; Paj-Ĥi-Vo al San-Ĉu-San; kaj San-Ĉu-San sciigis al Tzung-Ĥi-Tzang.

Mallumigis. La pluvo ĉesis. Blovdadis venteto, kiu disbalancigadis la arbojn, kaj la pluverojn,



lumaj kiel rubenoj, faladis sur la bonodoraj floroj, kiuj fajerigis kaj bruligis, lumigitaj per la radioj de la malaperiganta suno.

Per brilego kaj bonodoro estis plena la reĝa ĝardeno. La filo de la ĉielo, Li-O-A, staris apud la fenestro en sia porcelana palaco kaj raviĝis de la mirinda vidaĵo.

Sed juna kaj bona, li eĉ en tiu ĉi minuto ne forgesis la malfeliĉulojn.

Ĝokaze diris li, turnigante al Tzung-Ĥi-Tzang:

“Vi volis sciigi min, kiom da anoj en Pekingo ne havas ĉapojn por kovri siajn kapojn dum pluvo.”

“La deziro de la tutmonda posedanto estas plenumita per liaj servistoj!” respondis per malaltan riverencon Tzung-Ĥi-Tzang.

“Kiomaj ili estas? Nur diru al mi la veron!”

“En tuta Pekingo ekzistas jam ne unu Ĥino, kiu ne havas ion por kovri sian kapon dum pluvo. Mi juras, ke mi diras la veron!”

Kaj Tzung-Ĥi-Tzang levis siajn manojn, kaj klinigis sian kapon—signo de sankta ĵuro.

La vizaĝo de bogdihano lumiĝis per ĝoja, feliĉa rideto.

“Feliĉa urbo! feliĉa lando!” ekkriis li. “Kiel mi estas feliĉa, ke sub mia potenco tiel bone vivas la popolo.”

La ĉiuj ĝepalacanoj, vidante ke la bogdihano ĝojas, ekĝojis kune.

Kaj San-Ĉu-San, Paj-Ĥi-Vo kaj Ĥuar-Dzung ricevis la ordenon “*La ora Drakono*” pro siaj patrujaj zorgoj al la popolo.

## LA KONSCIENCO MALKURAĜIGAS ĈIUJN.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Antaŭ pli ol cent jaroj, niaj landanoj estis tre superstiĉaj, kaj eĉ la loĝantoj en nia vilaĝeto timis, kiam oni parolis pri fantomoj.

Ned Saunterer, la heroo de tiu ĉi rakonto, loĝis en proksima urbo, kie antaŭe estis nur malmultaj domoj, sed kiu nuntempe estas grandega kaj prospera urbo.

Dum kelkaj jaroj Ned laboris ĉe porcelana fabrikejo, sed li preferis vivon pli libera, Li tial aĉetis fajencajn komercaĵojn kaj vendis ilin en proksimaj kvartaloj.

Tiu ĉi metio prosperis kaj li baldaŭ povis aĉeti azenon por porti la komercaĵon kamparen.

Multe da friponaĵo ekzistis dum la priskribata periodo, kaj ne estis eksterordinara okazo, kiam oni haltigis vojaĝantojn sur la vojo, kaj rabis ilin.

La leĝfako malofte sin intermetis pri tiaj aferoj kaj oni ofte decidis malpacojn per la “du pugnoj.”

Por protekti sian komercaĵon kontraŭ tiuj ĉi ŝtelistoj, kiam li vojaĝis nokte, Ned alligis ĉenon al la kruro de la azeno, kaj ankaŭ surmetis sur ĝia kapo kovraĵon iom similan al du grandegaj kornoj. Tia estis la kredemo inter la vilaĝanoj pri supernaturaj estaĵoj ke, kiam oni aŭdis la tintadon de la ĉeno kaj vidis strangan nekonatan beston tra la mallumo oni ĝin kredis esti la diablo, kaj forkuris kiel eble plej rapide.

Nia vilaĝeto tiatempe konsistis el malmultaj unuopaj dometoj kaj unu preĝejo. Unu el tiuj ĉi dometoj enhavis, oni diris, fantomon, kaj neniu volis tie loĝi.

Post kelkaj monatoj du strangaj viroj alvenis, kaj, malgraŭ la fantomo, luis la dometon.

Ili tamen ne estis ŝatataj de la najbaroj, kaj oni ilin rigardis kiel suspektuloj. Ili posedis ĉevaleton kaj ŝarĝoveturileton, sed ŝajnis al ĉiu ke ili neniam uzis ĝin.

Tiatempe, ĉe multaj Anglaj vilaĝetoj, homoj ofte kontraŭleĝe elterigis la mortintojn el la preĝejkorto, kaj vendis la ostojn.

Al tiu ĉi metio apartenis la du viroj.

Unu mallumegan kaj ventegan nokton, ili eniris la preĝejkorton, kun la ĉevaleto, ŝarĝoveturileto kaj fosiloj, kaj komencis malfermi unu el la tomboj.

Nia amiko Ned ankaŭ veturis frumatene al malproksima urbo kaj, revenante, li perdis la vojon. Post kelkaj horoj, li trovis sin apud nia vilaĝa preĝejo, kaj la azeno vagis al la preĝejkorto. Malgraŭ la ventego, la du homoj en la tomo jam ekaŭdis la supernaturan sonon de la ĉeno alligita al la kruro de la azeno, kaj unu el ili, subite suprenrigardinte, vidis tute apude ion, kion li kredis esti terura korna diablo.

Kun laŭta kriego la du viroj suprenrampis el la tomo, kaj rapide malaperis en la mallumo.

Kiam Ned komprenis kio okazis, li ĝojis pro sia bonŝanĉo, kaj, sen ia konsciencedubo, tuj posedigis je la ĉevaleto kaj ŝarĝoveturileto, kaj uzis ilin por veturigi sian komercaĵon.

La du viroj neniam revenis por demandi siajn posedaĵojn, ĉar ili timis la leĝan punon, kiu atendas ĉiujn korpoŝtelistojn.

## PLUVO.

De Dorosievic, tradukita (el la Bulgara) de Penko Petrov (Jalta).

La ĉiela filo, lia nomo travivu la universon, imperiestro Li-O-A staris apud fenestro en sia porcelana palaco.

Li estis juna tial bona. Post la lukso kaj brilego li ne ĉesis pensi pri la malriĉuloj kaj malfeliĉuloj.

Estis pluvo. Larmaroj fluadis, ploradis la ĉielo, arboj kaj floroj faligadis larmojn post ĝi.

Enuo turmentadis la koron de la imperiestro kaj li ekkriis:

“Bedaŭrindaj tiuj, kiuj en pluvo ne havas eĉ ĉapon sur la kapo,” kaj turnigante al sia ĉambelano li diris:

“Mi volus scii kiom da tiaj malfeliĉuloj estas en mia Pekingo.”

“Lumo de la suno!” diris, genufleksante kaj kapklinigante Tzung-Ĥi-Tzang, “Ĉu estas io neebla al la ordonanto al la reĝoj? Eĉ antaŭ la suno malaperos, Vi scios, patro de la aŭroro, tion ĉi, kio estas kompleza al Vi.”

Kaj la imperiestro ridetis bonkore, kaj Tzung-Ĥi-Tzang tuj iris, uzante sian tutan forton, ĉe ĉefministro San-Ĉu-San.

Li alvenis laciĝspire kaj rapide, eĉ ne sukcesis fari ĉiujn respektojn, kiujn oni donas al ĉefministro.

“La ĝojo de la universo, nia plej afabla ordonanto (premiĝante, li parolis) estas en terura maltrankvileco.

Lin maltrankviligas tiuj ĉi, kiuj iras dum pluvo sen ĉapoj en nia Pekingo, kaj li deziras scii eĉ hodiaŭ, kioma estas ilia nombro!”

“Jes, ekzistas tiaj sentaŭguloj!” respondis San-Ĉu-San. Kaj li ordonis, ke oni alvokigu la urbestron Paj-Ĥi-Vo.

“Malbonaj novaĵoj de la palaco,” diris li al ĵus enirinta Paj-Ĥi-Vo, kiu por esprimi atenton klinigis sian kapon. “La posedanto de nia vivo rimarkis malordon!”

“Kiel!” terure ekkriis Paj-Ĥi-Vo. “Ĉu jam ne estas apud la palaco la ĝardeno enombrita, kiu ĉarmas Pekington je la okuloj de la bogdihano?”

“Mi ne scias bone, kiel okazis tio ĉi,” respondis San-Ĉu-San, “sed Lian Moŝton terure maltrankviligas la sentaŭguloj kiuj iradas dum pluvo sen ĉapoj. Li deziras scii eĉ hodiaŭ kiomaj estas ili en Pekingo. Vi ordonu!”

“Vi alvokigu, por ke venu ĉe mi, tuj, tiu ĉi maljuna hundo Ĥuar-Dzung!” kriadis post minuto Paj-Ĥi-Vo al siaj subuloj.

Kiam la estro de la urba patrolo, paliĝinta de teruro tremante falis inter liaj piedoj, la mandarino elfluigis sur li falakvon de malbenoj.

“Fripono, sentaŭgulo, malnobla perfidulo! Vi volas, ke ili dishaku nin ĉiuj kune kun vi, en pecoj!”

“Klarigu al mi la kaŭzon de via kolero”—parolis treminta de timo apud la piedoj de la mandarino, Ĥuar-Dzung—“por ke mi povu kompreni la konsolantajn vortojn, kiujn vi parolas al mi; alimaniere, mi timas, ke mi ne povos kompreni la lingvon de via saĝeco.”

“Maljuna hundo, kiu devus gardadi ie porkan aron, sed ne la plej grandan urbon en la tuta mondo! La reĝo Ĥina mem estas rimarkinta, ke en la urbo ekzistas senordo—sur la stratoj vagas sentaŭguloj, kiuj eĉ dum pluvo ne havas ĉapon por ĝin meti sur kapo. Vesperon ankoraŭ vi sciigu min, kiom da tiaj sentaŭguloj estas en Pekingo!”

“Ĉio precize estos plenumita!” respondis Ĥuar-Dzung, ekbatinte sian frunton tri fojojn sur la plankon.

Post kelke da minutoj li murmuregis kaj frapadis per piedoj sur la kolektitaj policanoj.

“Brutoj el kiuj mi pendigos la duonon, por ke mi povu vivajn bruligi la ceterajn! Tiel vi observadas la urbon! Dum pluvtempo iuj sentaŭguloj estas irintaj sen ĉapoj! Ĉiuj estu elkaptitaj post horo (la Ĥina horo = 40 minutoj), alimaniere la diabloj vin prenos.”

La policanoj iris plenumi la ordonon—dum unu horo sur la stratoj de Pekingo ekzistis efektiva ĉaso.

“Nu kaptu lin! Kaptu lin!” kriadis la policanoj, persekutante la homojn, kiuj nehavis ĉapojn.

Ili eltiris ilin sub la bariloj, sub la pordoj de la domoj, kien ili estis kaŝigintaj.

Post horo sen unu minuto, ĉiuj en Pekingo, kiuj ne havis ĉapojn sur siaj kapoj, staris en la korto de la malliberejo.

“Kiomaj ili estas?” demandis Ĥuar-Dzung.

“Dudek mil okcent sepdek unu!” respondis la policanoj, klinigante eĉ ĝis la tero.

“La mortigistoj tuj aperu!” ordonis Ĥuar-Dzung.

Kaj post duono da horo 20,871 senkapigitaj Ĥinoj kuŝadis en la korto de la malliberejo.

20,871 da kapoj estis metitaj sur ponardegoj kaj dispartitaj el la urbo por saĝigado de la popolo.

Ĥuar-Dzung iris raportadi al Paj-Ĥi-Vo; Paj-Ĥi-Vo al San-Ĉu-San; kaj San-Ĉu-San sciigis al Tzung-Ĥi-Tzang.

Mallumigis. La pluvo ĉesis. Blovadis venteto, kiu disbalancigadis la arbojn, kaj la pluverojn,

lumaj kiel rubenoj, faladis sur la bonodoraj floroj, kiuj fajerigis kaj bruligis, lumigitaj per la radioj de la malaperiganta suno.

Per brilego kaj bonodoro estis plena la reĝa ĝardeno. La filo de la ĉielo, Li-O-A, staris apud la fenestro en sia porcelana palaco kaj raviĝis de la mirinda vidaĵo.

Sed juna kaj bona, li eĉ en tiu ĉi minuto ne forgesis la malfeliĉulojn.

Ĝokaze diris li, turniĝante al Tzung-Ĥi-Tzang:

“Vi volis sciigi min, kiom da anoj en Pekingo nehavas ĉapojn por kovri siajn kapojn dum pluvo.”

“La deziro de la tutmonda posedanto estas plenumita per liaj servistoj!” respondis per malaltan riverencon Tzung-Ĥi-Tzang.

“Kiomaj ili estas? Nur diru al mi la veron!”

“En tuta Pekingo ekzistas jam ne unu Ĥino, kiu nehavas ion por kovri sian kapon dum pluvo. Mi juras, ke mi diras la veron!”

Kaj Tzung-Ĥi-Tzang levis siajn manojn, kaj klinigis sian kapon—signo de sankta juro.

La vizaĝo de bogdihano lumiĝis per ĝoja, feliĉa rideto.

“Feliĉa urbo! feliĉa lando!” ekkriis li. “Kiel mi estas feliĉa, ke sub mia potenco tiel bone vivas la popolo.”

La ĉiuj ĝepalacanoj, vidante ke la bogdihano ĝojas, ekĝojis kune.

Kaj San-Ĉu-San, Paj-Ĥi-Vo kaj Ĥuar-Dzung ricevis la ordenon “*La ora Drakono*” pro siaj patrujaj zorgoj al la popolo.

## LA KONSCIENCO MALKURAĜIGAS ĈIUJN.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Antaŭ pli ol cent jaroj, niaj landanoj estis tre superstiĉaj, kaj eĉ la loĝantoj en nia vilaĝeto timis, kiam oni parolis pri fantomoj.

Ned Saunterer, la heroo de tiu ĉi rakonto, loĝis en proksima urbo, kie antaŭe estis nur malmultaj domoj, sed kiu nuntempe estas grandega kaj prospera urbo.

Dum kelkaj jaroj Ned laboris ĉe porcelana fabrikejo, sed li preferis vivon pli libera, Li tial aĉetis fajencajn komercaĵojn kaj vendis ilin en proksimaj kvartaloj.

Tiu ĉi metio prosperis kaj li baldaŭ povis aĉeti azenon por porti la komercaĵon kamparen.

Multe da friponaĵo ekzistis dum la priskribata periodo, kaj ne estis eksterordinara okazo, kiam oni haltigis vojaĝantojn sur la vojo, kaj rabis ilin.

La legafako malofte sin intermetis pri tiaj aferoj kaj oni ofte decidis malpacojn per la “du pugnoj.”

Por protekti sian komercaĵon kontraŭ tiuj ĉi ŝtelistoj, kiam li vojaĝis nokte, Ned alligis ĉenon al la kruro de la azeno, kaj ankaŭ surmetis sur ĝia kapo kovraĵon iom similan al du grandegaj kornoj. Tia estis la kredemo inter la vilaĝanoj pri supernaturaj estaĵoj ke, kiam oni aŭdis la tintadon de la ĉeno kaj vidis strangan nekonatan beston tra la mallumo oni ĝin kredis esti la diablo, kaj forkuris kiel eble plej rapide.

Nia vilaĝeto tiatempe konsistis el malmultaj unuopaj dometoj kaj unu preĝejo. Unu el tiuj ĉi dometoj enhavis, oni diris, fantomon, kaj neniu volis tie loĝi.

Post kelkaj monatoj du strangaj viroj alvenis, kaj, malgraŭ la fantomo, luis la dometon.

Ili tamen ne estis ŝatataj de la najbaroj, kaj oni ilin rigardis kiel suspektuloj. Ili posedis ĉevaleton kaj ŝarĝoveturileton, sed ŝajnis al ĉiu ke ili neniam uzis ĝin.

Tiatempe, ĉe multaj Anglaj vilaĝetoj, homoj ofte kontraŭleĝe elterigis la mortintojn el la preĝejkorto, kaj vendis la ostojn.

Al tiu ĉi metio apartenis la du viroj.

Unu mallumegan kaj ventegan nokton, ili eniris la preĝejkorton, kun la ĉevaleto, ŝarĝoveturileto kaj fosiloj, kaj komencis malfermi unu el la tomboj.

Nia amiko Ned ankaŭ veturis frumatene al malproksima urbo kaj, revenante, li perdis la vojon. Post kelkaj horoj, li trovis sin apud nia vilaĝa preĝejo, kaj la azeno vagis al la preĝejkorto. Malgraŭ la ventego, la du homoj en la tomo jam ekaŭdis la supernaturan sonon de la ĉeno alligita al la kruro de la azeno, kaj unu el ili, subite suprenrigardinte, vidis tute apude ion, kion li kredis esti terura korna diablo.

Kun laŭta kriego la du viroj suprenrampis el la tomo, kaj rapide malaperis en la mallumo.

Kiam Ned komprenis kio okazis, li ĝojis pro sia bonŝanĉo, kaj, sen ia konsciencdubo, tuj posedigis je la ĉevaleto kaj ŝarĝoveturileto, kaj uzis ilin por veturigi sian komercaĵon.

La du viroj neniam revenis por demandi siajn posedaĵojn, ĉar ili timis la leĝan punon, kiu atendas ĉiujn korpoŝtelistojn.

## CONISTON KAJ GRASMERE.

Originale verkita de A. R. Lambert, tradukita de D. H. Lambert, B.A.

Kiel Grasmere rememorigas sian ligilon al la nomo de Gulielmo Wordsworth, tiel Coniston devas ĉiam prezenti al ni la figuraĵon de Johano Ruskin.

Pri tiu ĉi egale kun tiu ni ŝajne sentas nin incititaj per kvazaŭa sankta devo fari pilgrimadon por viziti la ĉirkaŭaĵojn, kaj vidi la lastan restejon de la fama samtempa pensinto kaj Kritikisto. Ĉar, kiel ajn vaste homaj opinioj diferencu pri la ideoj de Ruskin rilate al la vivo kaj la belartoj, povas esti nur unu juĝo pri la grandeco de lia animo kaj la pura kaj alta stilo de lia instruado. Trovante do Ruskin'an ekspozicion malfermita en Koniston dum la somermonatoj nia deziro viziti la lokon tie pligrandigis.

La vojo de Windermere al Coniston kuŝas inter la plej belegaj en *Laglando*. Post la rivertransirejo ni pasas sur la ĉefvojo tra la vilaĝo Sawrey kaj laŭlonge "Esthwaite Water" ĝis kiam ni atingas la antikvan vendejurbon Hawkshead. Tien ĉi alveninte inter strangaj maljunaj domoj kaj gastejetoj kun suprependantaj fruntanguloj, lozengformaj vitraĵoj kaj eluzitaj nerektaj peronoj oni povas facile ŝajnigi esti malantaŭtenirinta kelkajn centjarojn.

La kortoj ankaŭ, malglate pavimitaj, la maljuna arkita enirejo trans kiu aperas, kvazaŭ enkadrita, pli da dometoj, gajigitaj per la hela kolorado de rampkreskaĵoj kaj nasturtiumoj nepre ĝojigas la arteman spiriton.

Tie ĉi almenaŭ sin trovas pejzaĝetoj de antikva Anglujo nedifektitaj de la nuntempa konstruado.

Al la vojaĝanto de Hawkshead la lando prezentas vidigon belegan kaj majestan. La montoj "Weatherlam" Conistona "Old Man" kaj aliaj ekaperas ĝis kiam, elirante el la beleta arboflankigita parto de la vojo ni vidas antaŭ ni meze de ĝiaj helaĵoj Konistonan lagon; tiam preterpasinte la lagfontejon ni ricevas bonan vidaĵon de "Brantwood," kaj post ne longe ni eniras en la vilaĝeton Coniston. Vizitinte la tombejon de Ruskin kiu nun entenas belan monumenton, ni daŭrigas nian vojon ĝis la Institute, kie troviĝas la muzeo. Tiuj kiuj ankoraŭ ne vidis la Sheffield'an muzeon devas impresiĝi en tiu ĉi ekspozicio per profunda sento pri la artistaj povoj de Ruskin. La delikateco kiun li montras prezentante montpejzaĝaron, la poetsento, belforme kaj perfekta desegnotertece kiujn li vidigas per siaj skizoj en Venecio kaj ĉie en Italujo konigas al ni supermezuran talenton. La kolekto, laŭtempe ordigite, formas kiel la antaŭparolo de la katalogo nin sciigas "pentritan vivrakonton per si," ĉar la

antaŭaj skizoj prezentas malmulte pli ol konturojn, dum kelke da la antaŭnelongaj desegnaĵoj tie ĉi ekspoziciitaj helpis ilustrii liajn librojn "*Modernaj Pentristoj*," "*Stonoj Veneciaj*," k.c.

Liaj detalpentraĵoj de foliario kaj inkplumverkitaj skizetoj estas mirindaj kaj unu desegnaĵo de senvivaj objektoj, ekzemple, inkujo, sorbpapernujo, k.t.p., ne forgesante tiun de Aŭstrala opalo, klarigas kun kioma brileco li sukcesis kolorigi.

Estas du portretoj de Ruskin faritaj de B. W. Richmond, R.A., unu kiel junulo tre belvizaga, la alia kiel mezaĝa viro, ankaŭ unu pentrita de Arthur Severn ne longe antaŭ la morto de Ruskin, kaj unu verkita de Collingwood, figurante la Profesoron en lia Kabineto ĉe Brantwood. Belaj ekzempleroj de la verkoj de la antikvaj estroj pendas je la malproksima parto de la ĉambreto, tri originale de Turner, unu el kiuj liaj amikoj donacis al Ruskin ĵus resanigintan post severa malsano.

Ĉu multaj samtempuloj legas Wordsworth, mi volus scii t.e., multe da la publikaro? Mi kredas ke ne; tamen tion kion Ruskin elfaris pro arto oni povas vere diri ke Wordsworth efektivigis por ke oni ellernu kaj poete komprenigu Naturon tra ĉiuj ŝiaj kapricaj fazoj. Kio oni povas elserĉi poemojn pli perfektajn, kaj la versoj verkitaĵoj apud Tintern Abbey Naturspiriton mem elspiras.

Je tiu ĉi centjaro kun ĝiaj novaj ideoj kaj movadoj kaj pli vastaj celoj ni ofte emas forgesi tion, kion ni ŝuldas al la grandaj forpasintaj geniuloj, sed kiom ajn ni cedu pli aŭ malpli al la nuna mondsprito ni vidigas tamen kiom ni altestimas tiajn animojn vizitante la scenojn kiujn nia rememorigo pri ili sanktigas.

La plej belan vidaĵon de la lago de Grasmere oni ricevas de la supro de Dunmail Raise. Ĉirkaŭite de altaj montoj ĝi prezentas pentraĵon je trankvila ripozplena beleco preskaŭ nesuperebla, kaj certe nenia imagebla loko pli taŭgus por la loĝejo de poeto. Malrapide malsuprenirante oni sentas ĉie la spiriton de la fama poetfilozofo. Multe da liaj plej belaj poemoj estas skribitaj ĉe Grasmere, kaj baldaŭ post kiam li ekloĝis tie oni publikigis la duan volumon da la *Liraj Baladoj* el kiuj eble la plej bone konata estas la altega "*Odo pri Senmorteco*."

Tiu ensorĉa poemo "*La antikva Maristo*" partoprenis al la "*Baladoj*." Coleridge kaj Wordsworth interkonsentis kunlabori serion da poemoj samtempe eldonotaj. "Rimarkinda viro, havante grandajn grizajn okulojn" kiel la poeto priskribas Coleridge—ja, li kun sia vagidea filo kaj De

Quincey tiom rememorigas al ni Laglandon kiam Wordsworth mem.

Nenian pli laŭidean loketon por poeta lastripozejo oni povas bone pripensi ol la preĝejkorton ĉe Grasmere. La rivero Rothay murmuris apude kaj tie ĉi la simplaj rektaj ŝtonoj kiuj konatigas la tombejon de la poeto kaj de aliaj liaj parencoj nin impresas pli forte ol monumentoj pli imponaj.

Jen enteriĝis ankaŭ Hartley Coleridge; en la ĥorejo de la preĝejo vidiĝas medaliono enhavante kapon de Wordsworth supreskribita de la verkinto de la "Jaro Kristana"; "Dove Cottage" poste nin interesas, kie la junaj geedzoj pasigis sesjaran feliĉon. Ĝi estas tute kampara dometo, havante lozenĝformajn vitrojn kaj alkovojn kun benkoj kaj mallumaj enkadritaj muroj; ĝi elrigardas same kiel kiam Wordsworth tie loĝadis sed nuntempe oni ĝin rizervas nur pro vizitantoj. Multaj antikvaj gravuraĵoj pendas de la muroj konsistante el portretoj de la edzino de la poeto, de lia filino Doro Quillinan kaj lia fratino Doroteo, kaj en supraĉambro estas kelkaj figuraĵoj de Wordsworth kiam junulo kaj kiam maturaĝa viro.

En apuda ĉambro estas portretoj de Coleridge, lia filo Hartley, Matthew Arnold, De Quincey kaj aliaj. Al tiu ĉi parto de la domo aliĝis la ĉambro por servi kiel Wordsworth'a muzeo, sed nune ĝi estas en komenciĝa stato.

La posta ĝardeno estis formata de la poeto, kaj suprenirante per kelkaj turniĝadantaj ŝtupoj oni atingas ĉarman laŭbon, de kiu oni havas belegan vidaĵon de la lago kaj la monto "Silver How";

tie ĉi neinterrompita li povis senvorte interkomunigi kun Naturo.

"Rydal Mount," malproksima tri mejlojn de Grasmere, la hejmo de la poeto dum la lastaj tridek-sep jaroj de lia vivo sendube estas pli bonkonata, kaj la pejzaĝaro estas egale bela. Sed laŭ mia pensado estas speciala altiro al tiu ĉi humila dometo okupata de la juna poeto antaŭ lia genio estis akirinta la ĝeneralan rekonigon kiun li meritis Enirante en Rydal post la ĉirkaŭiro de "Loughrigg Fell" kun "Fairfield" plene videbla oni preterpasas la kamparejon de D<sup>ro</sup> Arnold, "Fox How," "Fox Ghill" la domon de la mortinto Sinjoro W. E. Forster, kaj "Loughrigg Holme," kie vivis Doro Quillinan kun sia edzo, kaj kie post ilia morto, ŝiaj du filinoj Rothay kaj Jemimo Quillinan vivis kaj mortis. Nenio povas superi la belecon de la ĉitiea pejzaĝaro simila je parko, kiel la vojo turniĝadas laŭlonge la rivero Rothay ĝis kie oni trafas la ĉefvojon kaj trovas sin kontraŭ "Rydal Hall" la kappalaco de la Le Flemings.

Multaj kapablaj verkintoj temigis la neordinaran belecon kaj ĉarmecon de Laglando, kaj malmultaj el tiuj kiuj vizitis tiun naturdotan landon ne volonte revizitis regionon tiel pentrandan, al ni karigitan kaj sanktigitan per ĝiaj literaturaj memoroj.

Tiuj ĉi vere kune kun la imponeco de ĝia scenaro devas je eterne interesigi nian Anglan Laglandon al ĉiuj kiuj estimas je ilia vera valoro la grandajn forpasintajn animojn.

## INFLEXIBLE.

Out of the night that covers me,  
Black as the pit from pole to pole,  
I thank whatever gods may be  
For my unconquerable soul.

In the fell clutch of circumstance  
I have not winced nor cried aloud:  
Under the bludgeonings of chance  
My head is bloody, but unbowed.

Beyond this place of wrath and tears  
Looms but the horror of the shade,  
And yet the menace of the years  
Finds and shall find me unafraid.

It matters not how strait the gate,  
How charged with punishments the scroll,  
I am the master of my fate,  
I am the captain of my soul.

W. E. HENLEY.

## NEVENKEBLA.

El min kovranta nokto, nigra ĉie  
De unu lim' polusa ĝis alia,  
Mi dankas kiajn diojn estu tie,  
Pro la animo nevenkebla mia.

Ĉe prem' fatala de okaz' perforta  
Mi ne tremetis, ankaŭ ne kriadis;  
Ĉe la bategoj de malbono sorta  
Vunditan kapon rekte mi tenadis.

Post la koler' kaj larmoj de la tero,  
Terura ia ombro nur aperas;  
Kaj tamen la minacoj de mistero  
Min ne timigas, nek mi malesperas.

Do kiel ajn la leĝ' severa estas,  
Aŭ kiel puna la skribaĵo sia,  
De mia sorto mi la mastro restas,  
La kapitano de l' animo mia.

Tradukita de BRN ELMY.

## EL "KORBO DE PENSOJ."

De Ant. Gr. Rubinstein,<sup>1</sup> tradukitaj de Vs. Lojko (St. Petersburg).

En muziko nenion oni povas *argumenti*: nek belecon, nek malbelecon. Se iu dirus: la naŭa simfonio de Beethoven estas abomena muziko, oni povas nur turni al li dorson, sed argumenti, ke li diras sensecaĵon—estas neeble. Grandan signifon havas muzika kaj estetika klereco, disvolvanta kapablon diferencigadi en muziko belan de malbela, sed signifo de klereco ankaŭ estas limigita, ĉar subjektiva sento ĉiam ludas tie ĉi grandegan rolon. En tio ĉi muziko havas komunajn trajtojn kun religio: *argumenti*, ke ekzistas Dio, ankaŭ estas neeble. Feliĉaj en ambaŭ okazoj estas tiuj, kiuj prave sentas.

Arto estas Evo, proponanta pomon al artisto. Kiu ekprovis tiun ĉi acidan pomon, tiu perdas paradizon de anima paco kaj kontenteco. Kaj kulpa en ĉio estas sukceso—tiu ĉi malica serpento.

Artisto, precipe artisto-kreanto, bezonas esti konfesita. Ne estas devige, ke tiu ĉi konfeso estu universala; estas sufiĉe, se ĝi eliras de negranda rondeto, eĉ nur de du-tri aldonituloj. En alia okazo kreema spirito estas dismordetata per maldolĉeco de dubo pri siaj propraj fortoj.

Por la publiko la vivo estas serioza fenomeno, la arto—amuzo; por la artisto—male.

Mi mem al mi ŝajnas treege nelogika: en vivo-respublikano kaj radikalulo, en arto—konservativulo kaj despoto.

Al mi ne unufoje venadis en kapon ideo verki muzikaĵon sub titolo "Amo—temo kun variacioj," sed mi ĝis nun ne plenumis tiun ĉi ideon. En pasintaj jaroj mi facile prosperadis verki temon, sed mankis necesaj sciaĵoj por variacioj, nun do al mi estas facile verki variaciojn, sed ne estas jam fortoj por temo.

Por muzika verkisto, kiun nun oni ne deziras koni, restas nur konsolo en espero, ke povas esti ankaŭ en regiono de muziko oni sin prenos iam je arĥeologiaj disfosoj.

En sentenco "Se juneco sciis, se maljuneco povus" estas la "alfa" kaj la "omega" de la tuta filozofio de la vivo.

Nur sanaj homoj povas esti ateistoj. Mal-sanuloj, suferantoj, povas, kompreneble, por kelka

tempo ekdubi je Kreinto, sed ne malkonfesi lin. Espero nutras ilian kredon, kredo—esperon.

Junulo—pesimisto, laciĝinta vivi, estas inda je rido kaj mallaŭdo: ja li ne havis eĉ tempou por ekkoni la mondon kaj la vivon de ĉiuj flankoj; sed maljunulo, restinta vivegoja optimisto, ŝajnas al mi ankaŭ stranga kaj negranda: ĉe li ja estis sufiĉa tempo por ekkoni la mondon kaj la vivon de ĉiuj flankoj.

Se homo devenas de simio, restas demando, ĉu atingis li nun, fine, fizikan limon aŭ ĉu li estas kapabla pliperfektigadi kaj plu. Se estas vera tio ĉi lasta, ĉu oni ne povas konsenti, ke en estonto homo farigos eĉ anĝelo!

Sola vorto, kiu en la Angla lingvo ĉiam komencigas de granda litero, estas—I, "mi." Kiel bonege karakterizas tio ĉi la karakteron de Anglo!

Eminentaj personoj malofte gajnas eĉ proksima persona konatiĝo kun ili.

Neprava estas tiu, kiu diras, ke oni devas decidiĝi je edziĝo nur post tiam, kiam ambaŭ gepartoprenantoj tute ekkonis unu la alian. Oni povas esti fianĉo kaj fianĉino dum longaj jaroj, sed tute ekkoni unu la alian oni povas nur post la unua monato de edza vivo.

Pipro kaj salo aldonas gustecon al nutraĵo, batalado al vivo.

Se vi volas, ke vin oni bone akceptadu ie, venadu tien pli malofte.

Trufoj estas terpomoj de riĉuloj, terpomoj estas trufoj de malriĉuloj.

"Ekstremajoj sin tuŝas"—estas ebla, tial, ankaŭ ligo inter Rusujo kaj Francujo.

Plej granda feliĉo, kiu estas donita al homoj, estas lumo de suno. Ho, lumo de la suno! Eĉ strange estas, ke homoj, vivantaj sub blua suna ĉielo, havas tiujn samajn politikajn kaj socialajn malkontentojn, kiel tiuj, kiuj estas aljuĝitaj vivi sub muba ĉielo kaj nebuloj.

<sup>1</sup> Granda Rusa muzika verkisto kaj virtuozo, aŭtoro de bela opero "Demono," kies temo estas prenita el glora poemo "Demono" de M. Lermontov.



## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!

THE INTERNATIONAL MACHINE.

Endorsed by test of impartiality.  
The universal model of writers of all civilized nations.

Write Remington for literature descriptive of our  
machines.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100 Broadway, N.Y., U.S.A.

## La Remington

LA UNIVERSAL ESCRIBANINA.

¡Pensad en ello!

LA INTERNACIONAL MÁQUINA.

Esta máquina es la mejor de todas.  
La Universal más perfecta por sus múltiples ventajas.

Write Remington for literature descriptive of our  
machines.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Broadway, N.Y., U.S.A.

## ЦИВ. ИТ ПОВОД PARADIZON ИТИ.

|                   |                         |
|-------------------|-------------------------|
| For more articles | The reader will believe |
| The more columns  | Go, for you to know     |
| The more reviews  | Paradison is better     |
| The more contents | The more, more articles |
| The more contents | But in Paradise you     |

For full and complete information, send for our  
free list, published by Slavensky (S. & S.), Prague.

## The "Review of Reviews"

Is the Best Magazine for Busy People.  
And it is read by 7,000,000 "Students."

The aim of this Magazine is to give you more things  
the best writers consistently accomplish in a few pages.  
The best and general to the masses by best use  
with intelligent interest the great magazine of "General  
History."

Post Free for Twelve Months 25  
10 in. 7 1/2 in. or 2 1/2 in. wide.

SEND COUPONS TODAY, RECEIVED BY MAIL.

## FOR SALE

Two Original Remingtons (Gladys Photo  
for FBI) In fine condition. Reasonable.  
For all particulars write to THE EDITOR.

## Correspondence Lessons in Esperanto

1924-1925

MR. A. WITTEKAMP, Correspondence Teacher of Esperanto,  
17, Bedford Grove, Forest Hill,  
London, E.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korrespondadi

Sen. A. C. TOWN, 24, Gresham Avenue, Plymouth. — Des. interŝangi liter. pri. Sen. G. W. 21, 21st Street,  
Bro. C. B. BROWN, Penn. Buildings, Elm Pa. U.S.A. — Desiras korrespondi kun Kristianoj, Esperantistoj,  
Sen. EDUARD BÄCKSTRÖM, Ekayama, Japanio. — Desiras interŝangi postkartojn. — Ĝenerale, interŝangi  
interŝanĝojn kaj aperprezentajn markojn de Anglando kaj Britoj, kiel ankaŭ. — Ĝenerale, interŝangi  
Sen. L. A. TINE, Churchfield Hall, 8, Acton, London, W. — Desiras korrespondi kun ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.  
Sen. G. O. MONTAGU, Portland, Margate, Vauxhall, S. Anglorio. — Des. ĉiuj, ĉiuj ĉiuj, pri. Sen. pri.

La Kanto de la Respektistoj 24. (100.000.000.000)



# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

19. [Vol. II., No. 5.]

MAJO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 18, 6d. each; Later issues  
4d. each, net.

## VOĈO EL LA HIMALAJO. Letero de Anando.

La kvin sentoj malkovras la eksteran homon de unu al alia, sed ne la internan. La sciado nur de la ekstera homo de ĉiu alia ne povas fondi la veran parencecon inter homo kaj homo.

Estas nur kiam lingvo venas kaj malkovras la internan homon de unu al alia, estas nur kiam per lingvo ili eltrovas ke ili havas similaĵojn, ke la homoj ekkomprenas ke simila spirito aŭ individuco ekzistas en ĉiu homo. Tiu ĉi ideo reas postulas aĝojn por maturiĝi en tiun de universala frateco, kio nun estas bonekonata, almenaŭ nome, de ĉiuj civilizataj landoj.

Sed ekzistas ankoraŭ pli altan gradon, pli glora ol universala frateco.

Ĝi estas la *Universala Propro*, eltrovata de la antikvaj Hindaj saĝuloj. Ĝi signifas ke la Propro en la Homaro estas Unu kaj la Sama, kaj ne estas multespeca, aŭ simila.

Estas la funkcio de lingvo malkovri la internan homon kaj aranĝi lian parencecon rilate la aliaj. La malplej perfektigita dialekto efektivas tion inter la homoj de kiuj ĝi estas parolata.

Kia, do, estas la funkcio de nia Esperanta lingvo, la lingvo internacia?

Vere fondi kaj pliprofundigi ne sole la fratecon, sed ankoraŭ pli proksime—la Propron de ĉiuj homoj. Instrui ke oni pensu pri alia kiel pri Si, aŭ pensi *Si-e* (Sanskrit *atmavat*), se mi povos tiel skribi. La universala lingvo progresu tra ĉiuj landoj, vekanta la universalan senton, la *homecon* de ĉiuj homoj, la *Universalan Propron* de la Homaro, kaj tiam la gloro de la *Unu Si-o* post ĉio, brilos sur la mondon kaj estos videbla por ĉiuj, eĉ kiel estas videbla la suno. Tiam efektive la homoj farigos *niloj de lumo*, al kio celas la homa evolucio.

The five senses reveal the outer-man of one to another, but not the inner. The mere knowledge of the outer-man of each other cannot establish the true relationship between man and man.

It is only when language comes and reveals the inner-man of one to the other, it is only when through language they find out that they have similar feelings, that men rise to the idea of a similar spirit or self in each. This idea again takes ages to mature into that of universal brotherhood, which is now well known, at least by name, in all civilized countries.

But there is a step still higher, more glorious than universal brotherhood.

It is the Universal Selfhood, discovered by the ancient sages of India. It means that the Self in Man is One and the Same, and not many and similar.

It is the function of language to discover the inner-man and adjust his relation to others. The least developed *patois* does this among the people by whom it is spoken.

What, then, is the function of our Esperanto language, the international tongue?

To truly establish and deepen not only the brotherhood, but closer still—the Selfhood of all men. To teach one to think of another as *Self*, or “to think *Self-ly*” (Sanskrit *atmavat*), if I may say so. Let the universal language progress through all lands, waking up the universal feeling, the *humanity* of all men, the *Universal Selfhood* of Man, and then the glory of the *One Self* behind all will shine upon earth and be visible to all, even as the sun is visible. Then truly will men be children of light, towards the attainment of which is human evolution.

## SANSKRITA LEGENDO.

Tradukita de A. Randall &amp; L. K. Venner.

En la komenco, kiam Ajvashti venis al la kreo de la Virino, li trovis ke, kreinte la Virinon sia materialo elĉerpigis, kaj ke da malfuidaj elementoj neniom restis.

Je tiu malfacilego, post multe da meditado, li jene faris:

Li prenis la Rondecon de la Luno, kaj la Kurbojn de la Rampaĵoj, kaj la Tenigon de la Rampantaj Kreskaĵoj, kaj la Trememon de la Herbo, kaj la Maldikecon de la Kano, kaj la Floron de la Flor-kreskaĵoj, kaj la Malpezecon de la Folioj, kaj la Maldikiĝon de la Rostro de la Elefanto, kaj la Ekrigardojn de la Cervinoj, kaj la Kunvenon de la Abel-amasoj kaj la Ĝojan Gajecon de la Sunradio, kaj la Floremon de la Nuboj, kaj la Sangemon de la Ventoj, kaj la Timemon de la Leporo, kaj la Vanecon de la Pavo, kaj la Molecon de la Brusto de la Papago, kaj la Malmolecon de la Diamanto, kaj la Dolĉecon de la Mielo, kaj la Kruelecon de la Tigro, kaj la Varman Brilon de Fajro, kaj la Babilemon de Garoloj, kaj la Kares-murmuradon de Kolomboj, kaj la Hipokritecon de la Gruo, kaj la Fidelecon de la Ĉakavako, kaj, kunmetinte kune tiujn ĉi, li kreis la Virinon kaj ŝin donis al la Viro.

Sed, post unu semajno, la Viro venis al li kaj diris: "Sinjoro, tiu ĉi estaĵo, kiun vi donis al mi, malfeliĉigadas mian vivon. Ŝi senĉese babilas, kaj min turmentas pli ol estas tolereble, neniam permesante al mi pacon. Ŝi okupas mian tutan tempon, ŝi senkaŭze ploras, kaj ĉiam ŝi estas mallaborema. Mi venas por redoni ŝin, ĉar mi ne povas kun ŝi vivadi."

Tial Ajvashti diris "Tre bone," kaj li reprenis ŝin.

Tiam, post alia semajno la Viro revenis al li, kaj diris: "Sinjoro, mi sentis la vivon esti tre izola tuj kiam mi redonis tiun estaĵon al vi. Mi memoras ke ŝi dancis kaj kantis al mi, kaj mi memoras la flankrigardojn de la okuloj, kiel ŝi ludis kun mi, kaj min ĉirkaŭprenis, kaj ŝia rido estis muziko, kaj ŝi estis bela por rigardi, kaj mola por palpi; tial do redonu ŝin al mi!"

Tial Ajvashti diris "Tre bone," kaj li redonis ŝin.

Tiam, post nur tri tagoj, la Viro revenis denove al li kaj diris: "Sinjoro, mi ne povas ĝin kompreni, sed, malgraŭ ĉio, mi ĉertigas ke ŝi estas pli turmento ol plezuro al mi, tial, mi petas, reprenu ŝin."

Sed Ajvashti ekkriis: "Ho! Hontindulo, foriru! Mi tion ĉi ne suferos plu; vi devas fari tiel bone, kiel vi povos."

In the beginning, when Iwashti came to the creation of Woman, he found that he had exhausted his material in the making of Man, and that no solid elements were left.

In this dilemma, after much profound meditation, he did as follows:

He took the Rotundity of the Moon, and the Curves of the Creepers, and the Clinging of Tendrils, and the Trembling of Grass, and the Slenderness of the Reed, and the Bloom of Flowers, and the Lightness of Leaves, and the Tapering of the Elephant's Trunk, and the Glances of the Deer, and the Clustering of the Swarms of Bees, and the Joyous Gaiety of the Sunbeam, and the Weeping of the Clouds, the Fickleness of the Winds, and the Timidity of the Hare, and the Vanity of the Peacock, and the Softness of the Parrot's Bosom, and the Hardness of Adamant, and the Sweetness of Honey, and the Cruelty of the Tiger, and the warm Glow of Fire, the Chattering of Jays, and the Cooing of the Kabala, and the Hypocrisy of the Crane, and the Fidelity of the Chakawaka; and compounding all these together, he made Woman and gave her to Man.

But after one week Man came to him and said: "Lord, this creature whom you have given me makes my life miserable. She chatters incessantly, and teases me beyond endurance, never leaving me alone. She takes up all my time, she cries about nothing, and is always idle. I have come to give her back again, as I cannot live with her."

So Iwashti said "Very well," and he took her back.

Then after another week Man came to him and said: "Lord, I find that my life is very lonely since I gave you back that creature. I remember how she used to dance and sing to me, to look at me out of the corners of her eyes, and play with me and cling to me, and her laughter was music, and she was beautiful to look at and soft to touch; so give her back to me again."

So Iwashti said "Very well," and he gave her back again.

Then after only three days Man came back again to him, and said: "Lord, I know not how it is, but, after all, I have come to the conclusion that she is more of a trouble than a pleasure to me, so please take her back again."

But Iwashti said: "Out on you, shameful one! Be off! I will have no more of this; you must manage how you can."

Tiam la Viro diris: "Sed mi ne povas vivi kun ŝi!"

Kaj Ajvashti respondis: "Vi nek povas vivi sen ŝi." Kaj li turnis la dorson kontraŭ la Viro kaj daŭrigis sian laboron.

Tiam la Viro diris: "Kion mi faros? Mi ne povas kun ŝi vivi, kaj mi ne povas sen ŝi vivi!"

Then Man said: "But I cannot live with her."

And Iwashti said: "Neither can you live without her." And he turned his back on Man and went on with his work.

Then Man said: "What is to be done? For I cannot live with her, and I cannot live without her."

## LA FORĜISTO.

Kanto originale verkita de S<sup>r</sup>ino Reddet. (Sens).

Ho Forĝisto, forĝu feron!  
Prenu per muskola brako  
La martolon, forte frapu,  
Bona la plugferon faru.  
Jes, mi ekbruligas karbon,  
Kaj mi forĝas por la Vivo!

Ho Forĝisto, forĝu feron!  
Tiru el la ruĝa fajro  
Ĉiujn matiistajn ilojn  
De l' maŝinoj la radarojn.  
Jes, mi ekbruligas karbon,  
Forĝos tuj por Laboristo!

Ho Forĝisto, forĝu feron!  
Serĉu el la blua ŝtalo  
La plej bonan kaj flekseblan,  
Forĝu bisturilon akran!  
Jes, mi ekbruligas karbon,  
Forĝos tuj por Kuracisto!

Ho Forĝisto, forĝu feron!  
Aŭdu de la paflego  
Fore la teruran voĉon  
Kaj rapide forĝu glavon!  
Ne ne! Mi estingas karbon,  
Mi ne forĝos por la Morto!

## LA KATINO & LA KOKIDOJ.

Originale verkita de Jem Ross Archibald.

La interesa rakonto *Katnesto* sur la Februara numero de THE ESPERANTIST rememorigis al mi la saĝan maljunan katinon, kiun mi ofte vidis kune kun ŝiaj strangaj familioj en farmadomo, kien mi vizitis geamikojn.

Ŝia nomo estos Torty, sed ŝi estis ankaŭ nomita "Kara avineto," ĉar ŝi flegis kaj tre zorge vartis kelke da orfaj katidoj, kies malfeliĉajn gepatrojn la ĉasgardistoj mortigis en la proksima arbaro.

Kiam mi ŝin ekvidis, mi pensis la nomon "Avineto" tute taŭga por ŝia plen-zorga vizaĝo sed, tiatempe, mi ne konis, ke Torty posedis plumajn tiel bone kiel pelajn familiojn.

En tago mi ŝin vidis alportante en ŝia buŝo etan kokidon.

Mi tuj ekkuris, kiel mi tiam pensis, por savi la vivon al la malfeliĉa kokido.

Torty atingis la kuirejon, mi ŝin sekvis en tiun grandan ĉambron.

Ŝi gentile metis la birdeton en komfortan korbon apud la kameno. Ŝi blekis kaj murmuretis dum ŝi vartis la kokideton!

Mi diris al la servistoj, ke mi timis ke Torty mortigus la birdeton, kaj ili tiam diris al mi la sekvantan rakonton.

La farmamastrino unu tagon trovis kuvon da kokidoj, kies malserioza patrino forlasis ilin perej en la kortbirdejo.

Tion ĉi la farmamastrino tre bedaŭris, ĉar ili apartenis al bona raso de bela kortbirdaro, tial ŝi alportis ilin, kaj enmetis ilin en korbon apud la fajro en kuirejo.

Ŝi eliris el tiu ĉambro por trovi flanelon por kovri kaj varmigi la kokidojn.

Ŝi aŭdis la maljunan katinon murmurante apud la korbo, kaj diris "Torty! Kara katino, vi povos varmigi tiujn ĉi malfeliĉajn kreitaĵojn!"

Nu imagu ŝian miregon, kiam Torty blekis "Miaŭ (*Jes!*) kaj tuj eksaltis tre zorge en la korbon."

De tiu tempo, ĉiuj el la orfaj birdetoj fariĝis la genepoj de la aminda maljuna "Avineto Torty."

Oni povas priskribi la korbon de Torty ankaŭ kiel la *Katnesto*.

## "MORGAŬ."

Popoldira fabelo versigita de A. Motteau.

"Matene, morgaŭ, kampon mian,"  
Trenjo diris, "mi tuj plugos,  
Antaŭ ol sezon' forflugos,  
Aŭ grenon havos mi nenian."

Alvenis morgaŭ; la plugilo  
Tute preta lin atendis,  
Sed nun manĝinviton sendis  
Al li aminde la bofilo.

Eĉ Trenjon ŝanceligis tio . . .  
Ĉu li devos tuj plugiri,  
Aŭ ĉu ĉe filin' manĝiri ?  
Bah ! tago taŭgas por nenio.

Amiko Trenjo do festenis  
Ĉe l'bofilo kaj filino,  
Kie, eble, ruĝa vino  
Malfrue lin en lit' detenis.

Anstataŭ tago, du li perdis—  
"Morgaŭ mi pli longe plugos,"  
Diris li, "ne tiel taŭgos."  
Sitele morgaŭ trapluvadis.

Postmorgaŭ la veter' beligiĝis . . .  
Plugi ĉu nun povas Trenjo ?  
Ne, ĉar en la ĉevalejo  
Ĉevalo lia malsaniĝis.

Kaj tiam venis vilaĝfesto,  
Kaj neniu faris ion :  
Ŝatis Trenjo l' opinion  
Ke beno ĉiam estas resto.

Semajn' alia sin komencis  
Per grandega kampfoiro ;  
Eĉ forigi de l' vojiro  
Neniam Trenjo ja intencis.

Edziĝon tiam li alestis,  
Poste al enterigiro :  
Tro malfrue la deziro  
Por kampon plugi nun ĉeestis.

*Se post la semsezono plugos  
Prokrastulo kampon sian,  
Ne miregu se nenian  
Tritikon li engrenejigos.*

## ANTAŬ LA RIGARDO DE LA VIVO.

Tradukita de —ko.

Antaŭ la rigardo de la severa vivo staris du homoj, ambaŭ nekontentaj je ĝi, kaj al la demando : "Kion vi atendas de mi ?" unu el ili per laca voĉo diris :

"Mi estas indignigita per la krueleco de viaj interkontraŭecoj, senforte mia prudento penas kompreni la sencon de la ekzisto, kaj per senlumeco de malkompreno je vi animo mia estas plena. Mia memkonscio diras al mi, ke homo estas la plej bona el ĉiuj kreitaĵoj."

"Kion vi volas de mi ?" senpasie demandis Vivo.

"Feliĉon ! . . . Por feliĉo mia estas necese, ke vi interpacigu du fundamentojn de la interkontraŭecoj de animo mia : mian *mi volas* kun via *vi devas*."

"*Volution*, kion vi *devas* por mi," severe diris Vivo.

"Mi ne volas esti ofero via !" ekkriis la homo.

"Mi volas esti reganto de la vivo, sed devas mi kolon fleksadi en jugo de ĝiaj leĝoj—por kio ?"

"Vi parolu do pli simple !" diris la dua homo, starinta pli proksime al Vivo, sed la unua daŭrigis, ne doninte atenton al la paroloj de lia kolego :

"Mi volas liberecon, vivi en harmonio kun deziroj miaj, kaj mi volas esti por proksimulo laŭ sento de devo, nek frato, nek servanto, kaj mi estos tiu, kiel mi volos libere—sklavo aŭ frato. Mi ne volas en societo esti ŝtono, kiun societo kuŝigas, kien kaj kiel ĝi ekvolas, konstruante malliberejojn de feliĉo sia. Mi estas homo, mi estas spirito kaj prudento. Vivo, mi devas esti libera !"

"Haltu !" diris Vivo, severe ridetante. "Vi multe parolis, kaj ĉio, kion vi diros plu estas por mi certa. Vi volas esti libera ! Kio do ? Estu ! Bataladu kun mi, venku min, kaj estu por mi reganto ; kaj mi tiam via sklavo estos. Vi scias, mi estas senpasia kaj al venkantoj ĉiam facile cedadis. Sed estas necese venki ! Vi al batalado kun mi, pro via libereco, ĉu estas kapabla ? Jes ! Sufiĉe forta estas vi por venko kaj je forto via ĉu vi kredas ?"

Kaj la homo diris malgaje : "Vi entiris min en bataladon kun mem mi, vi akriĝis prudenton mian, kiel tranĉilon, ĝi enpuŝiĝis al mi malprokeimen en animon kaj dispremis ĝin !"

“Sed vi kun ĝi pli severe parolu, ne plendu,” diris la dua homo.

Sed la unua daŭrigis: “Mi ripozi volas de premo via. Ho donu al mi ĝui feliĉon!”

Vivo ree ekridetis per rideto, simila al brilo de glacio:

“Diru! Kiam vi parolas, ĉu vi postulas, aŭ petas?”

“Mi petas!” kiel ĉo la homo diris.

“Vi petas, kiel kutima almozulo; sed, malfeliĉulo mia, mi devas diri al vi—Vivo almozon ne donas! Kaj ĉu vi scias? Libera li ne petas, li mem prenas donacojn miajn. . . . Sed vi! Vi estas nur sklavo de miaj deziroj, sed ne pli. Libera estas tiu, en kiu estas forto de ĉiuj deziroj rifuziĝi por en unu sin enmeti. Ĉu vi komprenis? Foriru!”

Li komprenis, kaj kuŝiĝis, kiel hundo, ĉe la piedoj de la senpasia vivo por nerimarkeble kaptadi pecojn de ĝia tablo, ĝiajn manĝ-restaĵojn.

Tiam la senkoloraj okuloj de la severa vivo ekrigardis la duan homon—tio estis maldelikata, sed bona vizaĝo:

“Pri kio vi petas?”

“Mi ne petas, sed postulas.”

“Kion?”

“Kie estas justeco? Donu ĝin tien ĉi! Ĉion ceteran poste mi prenos, dume bezona al mi estas nur justeco. Mi longe atendis, pacience atendis, mi vivis en laborado, sen ripozo, sen lumo! Mi atendis. . . . sed sufiĉe! Kie estas justeco?”

Kaj Vivo al li senpasia respondis: “Prenu!”

## LA KONSCIENCO.

De Victor Hugo, tradukita de C. Guersent (Rouen).

Kune kun siaj infanoj, kiam Kaino, la haroj malordigitaj, la vizaĝo oliv-verdigita, tra la blovanta ventego forkuris malproksime de Jehovo kiam vesperiĝis, li malĝoje alvenis ĉe la malsupron de monto en vasta kamparo. Lia edzino lacigata, liaj senspiraj filoj petis de li: “Ni kuŝigu teren kaj dormu.”

Kaino, ne dormante, sonĝis malsupre de la monto. Levinte la kapon en la ĉiela funebra arkajo li vidis Okulon grande malfermatan, kiu, en la mallumo, fikse rigardis lin. “Mi estas tro proksime,” li diris tremante.

Li vekis siajn dormantajn filojn, sian lacigitan edzinon, kaj ree forkuris malĝoje tra la mondon. Tridek tagojn kaj noktojn li vagadis. Li marŝis muta, pala kaj tremanta je la plej malgranda brueto, ne rigardante malantaŭ si, ne ripozante, ne dormante.

Fine li alvenis ĉe la marbordoj de lando nomata Assuro.

“Ni haltu tie,” li diris, “ĉar tiu loko estas sendanĝera. Tie estas la fino de la mondo.”

Kiam li sidigis, li vidis ankoraŭ Okulon lin rigardantan ĉe la horizonto.

Tiam li skuigis de forta tremo:

“Ŝirmu min!” li ĝemis, kaj, la fingro sur la buŝo, liaj infanoj rigardis lin sovaĝe tremantan.

Kaino diris al Jabelo, patro de la vagantuloj de la vasta dezerto, kiuj loĝas sub vastaj tendoj: “Etendu tiuflanke la tol-tendon.”

Oni etendis la tolan mureton.

Kiam oni starigis ĝin per plombaj najloj: “Ĉu vi union plu vidas?” diris Tsillao, lia blonda nepino, dolĉa kiel matenruĝo; kaj Kaino respondis:

“Okulon mi ankoraŭ vidas.”

Ĵubalo, patro de tiuj, kiuj trapasas la vilaĝojn ludante per trumpetoj kaj frapante tamburojn ekkriis: “Mi konstruos barilegon.”

Li altigis bronzan muregon, kiu ŝirmis Kainon. Sed tiu ĉi ankoraŭ ĝemis: “Tiu ĉi Okulo ĉiam rigardadas min.”

Enoho diris: “Ni faru zonon de turoj tiel teruran, ke nenio povu alproksimiĝi. Ni faru fortikaĵon, kaj ni ĝin tute fermu.”

Tiam Tubalkaino, la forĝistestro, konstruis grandegan kaj superhoman urbon. Dum li laboris, liaj fratoj forpelis la Enosidojn, kaj la Sethidojn, kaj oni boris la okulojn de la preterpasantoj.

Vespere oni pafarkis al la steloj. La granito anstataŭis la tol-tendon; oni kunligis ĉiujn ŝtonojn per feraj ligiloj.

Infera ŝajnis la urbo. La ombro de la turoj noktigis la kamparon, la muregoj estis dikaj same kiel montoj, kaj oni skribis sur la pordo: “Estas tute malpermesate al Dio tien ĉi eniri!”

Kiam ili finis muregi, oni ŝirmis la avon en ŝton-turo, sed li restis funebra kaj okulfiksa.

“Ho, Avo mia! Ĉu la Okulo malaperis?” diris Tsillao tremanta, kaj Kaino ree ĝemis: “Ne, ĉiam ĝi estas tie.”

Tiam li diris: “Mi volas loĝi sub la tero, kiel homo tute sola en sia tombo; nenio plu vidas min, mi neniam ion plu vidas.”

Oni do fosis kavegon, kaj Kaino diris: “Bone!” Tiam li malsupreniris sola sub tiun malluman arkaĵon.

Kiam li estis sidiginta, kiam oni estis ferminta super lia kapo la subteran galerion, tra la mallumo, en la tombo, Kainon ĉiam fiksadis la Okulo.

## LA SONGO DE KLARENCO.

Tradukita el la dramo "La Rego Ricardo III." (Shakespeare) de C. Bicknell.

BRAKENBURO.

Kial malbone fartas Via Moŝto ?

KLARENCO.

Ho ! mi la nokton tre mizere pasis,  
Pro songoj kaj vidaĵoj terurigaj ;  
Do kvankam mi Kristan' fidela estas,  
Ne volus mi similan nokton pasi  
Por gajni mondon da feliĉaj tagoj,—  
Tiel terure estis kaj malĝoje !

BRAKENBURO.

Kaj Via Moŝta songo, kio estis ?

KLARENCO.

Mi pensis, ke mi el la Tur' forkuris.  
Kaj enŝipigis por la martransiro  
Al Burgundi', kun mia frat' Glostero ;  
Kaj li min vokis el ĉambreto mia  
Al la ferdek' : de tie ni rigardis  
Anglujon, kaj pri mil teruraj tempoj  
Dum la militoj inter Lankastero  
Kaj Yorko, ni parolis. Dum ni paŝis  
Laŭlonge la ferdekon kapturnigan,  
Mi pensas ke Glostero iom falas ;  
Kaj li, falante, min dejetas kiu  
Lin savu penas, en la maltrankvilajn  
Ondegojn de la mar'. Ho ! Dio mia !  
Ho ! Dio ! droni ! kia suferado !  
Ho ! kia akvobruo en l' oreloj !  
Kiom da mortvidaĵoj al l' okuloj !  
De ŝipoj derompaĵojn mil mi vidas,  
Kaj dekmil korpojn kiujn fiŝoj mordas ;  
Amasojn orajn, ankrojn kaj perlarojn,  
Juvelojn de valor' nekalkulebla,  
Ĉe l' fundo de la maro dissematajn :  
En la kranioj de l' mortintoj iuj ;  
Kaj en la truoj kie unufoje  
Okuloj loĝis, kuŝas pro malŝato,  
Juveloj rebrilantaj, kiuj kisas  
La koton de la mara profundaĵo  
Kaj nur mokadis ostojn de mortintoj.

BRAKENBURO.

Ĉu vi, mortante, libertempon havis  
Sekretojn de la maro por rigardi ?

KLARENCO.

Jes, tiel pensis mi, kaj ofte provis  
Delasi la spiriton ; sed l' akvaro  
Envia tenis ĝin, ne permesante  
Ke ĝi l' aeron vastan kaj malplenan  
Ĝksereĉu, sed sufokis ĝin en mia  
Ĝemanta korpo preskaŭ rompigitaj  
De penoj, por ke ĝi en maron iru.

BRAKENBURO.

Ĉu ne vekigis vi, pro l' agonio ?

KLARENCO.

Ho ! ne ! post vivo mia songo daŭris,  
Kaj la ventego en l' anim' komencis,  
Kiam, laŭ mia penso, ĝi transiris  
Kun la pramist' malgaja, li pri kiu  
Poetoj skribas, la melankolian  
Riveron, en la ĉiamnoktan regnon.  
L' unuo kiu mian fremdanimon  
Salutis, estis la famul', Warwick'o  
Bopatro nobla mia ; li ekkriis  
"Do kian punon pro ĵurrompo lia  
Malklara regno al Klarenco falsa  
Nun povas doni ?" kaj li neniigis.  
Tiam fantomo al angel' simila  
Kun la harar' per sango makulita,  
Vagante venis ; kaj li laŭte kriis  
"Klarenco estas alveninta, falsa  
Perfida, ĵurrompinta ; li, Klarenco,  
Kiu min vundis apud Tewkesbury'o :  
Ho ! kaptu lin, Furioj, lin konduku  
En viajn turmentadojn." Tiam fine,  
Mi pensis ke infera diablaro  
Ĉirkaŭas min, kaj tiel malbelege  
Kriegas, ke pro ili mi vekigas  
Tremante, kaj dum longa posta tempo  
Mi kredas ke mi estas en infero,  
Tiel terura ŝajnis mia songo.

BRAKENBURO.

Ne stranga estas ke ĝi vin timigis,  
Ĉar mi mem timas, eĉ per la rakonto.

KLARENCO.

Ho ! Brakenburo, mi por li, Edwardo,  
Aferojn faris, kiuj nun atestas  
Kontraŭ animo mia ; kaj rimarku  
Per kio li nun rekompencas min.  
Ho Di' ! se preĝoj Vin ne kontentigos  
Sed Vi Vin vengos pro la miaj krimoj,  
Sur mi, mi mem, kolero Via falu ;  
Ho ! la edzinon mian la senkulpan,  
Pardonu, kaj mizerajn idojn miajn.  
Gardisto, apud mi sidigu iom.  
La kor' lacigas, kaj mi volus dormi.

BRAKENBURO.

Sinjor', volonte ; Di' vin ripozigu.

(KLARENCO dormas).

## LA URBO DE LA DEMONOJ.

Tradukita de Elise Bauer (Munich).

Antaŭ multe da jaroj vivadis en la floranta urbo Kajro Hebrea rabeno nomita Johonano, kiu estis la plej eminenta klerulo en sia lando. Lia famo vastiĝis en la tuta Oriento, kaj la plej malproksimaj popoloj sendis siajn junulojn, por ensorbi saĝecon de liaj lipoj. Li estis profunde instruita en la tradicioj de siaj antaŭuloj, kaj en disputadoj lia vorto estis decidiga. Li estis pia, justa kaj severa, sed li havis unu malvirton—la amo por la oro estis kaptinta lian koron, kaj li ne malfermis sian manon al la malriĉuloj. Tamen li estis pli riĉa ol la plimulto, lia saĝeco estante por li la fonto de riĉeco. La Hebreoj de la urbo ĉagreniĝis pro tiu ĉi makulo en la karaktero de la plej saĝa el ili sed, kvankam la maljunuloj de la gento daŭrigis respekti lin pro lia famo, la virinoj kaj infanoj ne donis al li alian nomon ol: “Rabeno Johonano, avarulo.”

Neniu sciis tiel bone kiel li la ceremoniojn bezonatajn al la iniciatio en la religion de Moseo, sekve la ekzercado de tiuj ĉi solenaj oficoj estis por li alia fonto de gajno.

Unu tagon, promanante en la ĉirkaŭaĵo de Kajro, kaj paroladante kun junulo pri legoscienco, okazis ke la anĝelo de la morto ekfrapis lian akompananton. Li falis senmove antaŭ la piedoj de la rabeno, dume tiu ĉi estis ankoraŭ parolanta.

Vidante ke la junulo estas senviva, la rabeno disŝiris siajn vestojn kaj gloriis Dion. Sed lia koro estis ektuŝita kaj, nokte, pensoj pri la morto elturmentis lin. Li maltrankviliĝis pripensante sian malmolecon kontraŭ la malriĉuloj, kaj li diris: “Benata estu la nomo de Dio! Se iu petos min fari ion je Lia sankta nomo, mi ĝin faros senpage.” Sed li eksopiris, ĉar li timis ke oni povus peti lin pri porcio de lia oro.

Dum tiuj ĉi pensoj ankoraŭ okupis lin, laŭta krio aŭdiĝis antaŭ la pordego de lia domo.

“Vekiĝu, dormulo,” la voĉo diris, “Vekiĝu! Infano estas morte malsana, kaj la patrino sendis min por vi, por ke vi faru vian oficon.”

“La nokto estas senluma,” respondis la rabeno, alproksimiĝante la fenestron, “kaj miaj jaroj estas multaj. Ĉu ne estas en Kajro pli junaj viroj ol mi?”

“Mi estas sendita nur por vi, rabeno Johonano, nomita saĝulo de kelkaj, sed avarulo de aliaj. Jen estas oro,” li daŭrigis, eltirante monujon plenan je

zehenoj, “mi ne deziras vian laboron por nenio! Mi vin petegas veni, je la nomo de Dio!”

Tiam la rabeno memoris la ĵus-faritan promeson kaj li ĝemis spirite, ĉar la monujo ŝajnis esti multepeza.

“Ĉar vi petegis min en la Dia nomo, mi iros kun vi,” li diris al la viro, “sed mi esperas, ke la interspaco ne estas granda. Remetu la monon en vian poŝon.”

“La loko estas proksima,” respondis la fremdulo,—nobla, bele-vestita junulo. “Rapidu, ĉar mi ne devas perdi tempon.”

Johonano leviĝis, sin vestis, kaj, zorge ŝlosinte ĉiujn pordojn de sia domo kaj metinte la ŝlosilojn en sekretan lokon, li akompanis la fremdulon.

“Mi ne memoras tian malluman nokton,” diris la maljunulo. “Vi estu mia gvidisto, ĉar mi povas apenaŭ vidi la vojon.”

“Mi ĝin konas bone,” respondis lia akompananto, sopirante, “estas vojo multe vizitata, kaj hore traitata de multaj. Apogu vin sur mia brako, kaj ne timu.”

Ili antaŭen paŝadis. Estis mallume, sed heliĝis kelkfoje, kaj tiam la rabeno ekvidis, ke li sin trovis en loko al li nekonata.

“Mi kredis,” li diris, “ke mi konas la tutan ĉirkaŭaĵon de Kajro, tamen mi ne scias, kie mi estas. Mi esperas, mia amiko, ke vi ne estas perdinta la vojon.” Kaj li sentis malkuraĝon en la koro.

“Ne timu,” respondis la gvidisto, “via vojaĝo estas jam finiĝinta. Dum li parolis, la rabeno sentis siajn piedojn forgliti, kaj li malsupren rulis grandan deklivon. Retrovinte sin, li ekvidas, ke sia akompananto estis ankaŭ falinta, kaj staris nun apud li.

“Ne, junulo, se vi petolos tiamaniere kun maljunuloj, viaj tagoj ne estos multaj! Ve al tiu, kiu insultas grizharojn!” diris la rabeno.

La fremdulo senkulpigis sin, kaj ambaŭ daŭrigis silente la marŝadon.

La mallumo malpliĝis, kaj la mirigata rabeno ekvidis, ke ili estas venintaj al la pordegoj de urbo, kiun li neniam antaŭe vidis. Kaj li ja konis ĉiujn urbojn en Egiptujo, kaj estis nur duono da horo de lia foriro de lia loĝejo en Kajro! Tial li ne sciis kion pensi, kaj sekvis la viron tremante.

Baldaŭ ili trapaŝis la pordegojn de la feste iluminata urbo. La stratoj estis plenigataj de festigantoj, kaj gojaj sonoj aŭdiĝis.

Sed, rigardante la vizaĝojn de la preter-pasantoj, Johonano ekvidis, ke tiuj ĉi estas la vizaĝoj de homoj interne elturmentataj kaj, de la markoj kiujn ili havis, li sciis ke ili estas demonoj (Mazikenoj).

Li estis profunde terurita, kaj je la torĉ-lumo li rigardis nun ankaŭ sian akompananton. Ankaŭ li havas la saman markon.

La rabeno timigis multege, li preskaŭ svenis, sed li pensis ke estas pli bone silenti, kaj malgaje li sekvis sian gvidiston, kiu kondukis lin al belega domo en la plej bela kvartalo de la urbo.

"Eniru!" diris la demono al Johonano, "ĉar tiu ĉi domo estas mia. La sinjorino kaj la infano estas en la supra ĉambro."

La rabeno supreniris la ŝtuparon, kaj eniris la ĉambron.

La sinjorino, kies eksterordinara beleco estis vualita de senespera melankolio, kuŝis en lito, apud ŝi la infano, en riĉaj vestaĵoj, dormetis sur la genuoj de vartistino.

"Rebeka, lumo de miaj okuloj, amatino de mia animo," diris la demono, "mi alkondukis al vi la rabenon Johonanon, la saĝulon, kiun vi deziris. Vi permesu ke li tuj komencu sian oficon, ĉar li deziras reformiri rapide."

Dirante tion ĉi, li ridetis maldolĉe, kaj rigardis la rabenon. Tiam li eliris el la ĉambro sekvata de la vartistino.

Kiam Johonano kaj la sinjorino estis solaj, ŝi sin turnis al li, dirante: "Malfeliĉulo! ĉu vi scias kien oni vin kondukis?"

"Mi ja scias," li respondis kun profunda ĝemo, "mi scias, ke mi estas en la urbo de la Mazikenoj."

"Sciu do plue," ŝi diris, kaj la larmoj fluegis el ŝiaj okuloj, pli brilaj ol diamantoj, "sciu do plue, ke neniu estas iam alkondukita tien ĉi, kiu ne estas pekinta kontraŭ Dio. Ne estas necese, ke vi sciu mian pekon, kaj mi ne serĉas scii vian. Sed ĉi tie vi restados por ĉiam, perdita kiel mi estas perdita." Kaj denove ŝi ekploregis.

La rabeno ĵetis sian turbanon teren, kaj, elŝirante siajn harojn, li ekkriis: "Ve al mi! Kiu vi estas, virino, kiu parolas tiamaniere kun mi?"

"Mi estas Hebreino," ŝi diris, "filino de doktoro de legoscienco en la urbo Bagdad kaj alkondukita tien ĉi, vi ne demandu kiel! Mi edziniĝis kun la Princo de la Mazikenoj, la sama kiu serĉis vin. La infano, kiun vi vidis, estas mia unue naskito, kaj mi ne povas toleri la ideon, ke la animo de tiu ĉi senkulpa infano devos pere! Mi tial petegis mian edzon, ke li penu alkonduki tien ĉi pastron, por ke la leĝo de Moseo—benata estu lia memoro—estu plenumata. Kaj via famo, kiu etendis sin ĝis Bagdad kaj ankoraŭ pli malproksime igis min pensi pri vi. Mia edzo, kvankam eminenta inter la Mazikenoj, estas pli justa ol la aliaj demonoj, kaj

li amas min, kiun li ruinigis kun amo de malespero. Li do diris, ke la nomo de la saĝa Johonano estas bone konata al li, kaj ke li scias, ke vi ne povos rifuzi al li. Vi mem devos scii, kion vi estas farinta, por doni al li tian povon super vi."

"Mi ĵuras antaŭ la ĉielo," diris la rabeno, "ke mi ĉiam respektegas diligente la leĝon, kaj vivadis konstante laŭ la tradicioj de niaj patroj, de la tago de mia naskiĝo, ĝis nun. Mi ne faris malbonon al iu ajn, aŭ per vorto aŭ faro, kaj ĉiutage mi adoras la Sinjoron, plenumante detale ĉiujn postulitajn ceremoniojn!"

"Ne," diris la sinjorino, "ĉion tion vi povas esti farinta, kaj pli ankaŭ, sed, malgraŭ tio ĉi, la demonoj povas posedi povon super vi. Sed la tempo pasas, mi aŭdas la paŝojn de mia edzo sur la ŝtuparo. Ekzistas por vi unu ŝanco de foriro."

"Kia ĝi estas? Ho, ĉiela sinjorino, diru ĝin al mi!"

"Ne mangu, ne trinku, ne akceptu pagon aŭ donacon dum via estado en tiu ĉi domo, kaj tiom da tempo, kiom vi tiel agas, la Mazikenoj ne havas povon super vi, viva aŭ senviva. Estu kuraĝa, kaj persista!"

Kiam ŝi ĉesis paroli, ŝia edzo revenis en la ĉambron, sekvata de la vartistino, kiu portis ĉiujn necesajojn por la ceremonio.

Kun multepeza koro li faris sian oficon, la vino estis, kiel kutime, ĉirkaŭ-pasigata, por ke la infano, la patrino kaj la rabeno gustumu ĝin. Li rifuzis ĝin, dirante: "Pardonu min, Sinjoro, sed mi faris sanktan promeson fasti hodiaŭ, kaj mi nek mangas nek trinkas."

"Faru laŭ via ŝato," diris la demono, "mi ne deziras, ke vi ne plenumu vian promeson!" kaj li ekridegis.

Tiam la malfeliĉa rabeno estis kondukata en ĉambron, rigardantan sur ĝardenon, kie li pasigis la ceterajn noktajn horojn kaj la sekvantan tagon, ploregante, kaj preĝante la Sinjoron, ke li liberigu lin el la urbo de la demonoj.

Sed kiam la dekdua horo batis kaj la suno estis subirinta, la princo revenis al li kaj diris: "Mangu nun, mi vin petas, ĉar la tago estas pasinta, kaj li metis mangaĵojn antaŭ li."

"Pardonu de nove vian servanton, mia sinjoro!" respondis Johonano, "ĉar mi faris sanktan promeson ankaŭ por tiu ĉi tago. Ne koleriĝu kontraŭ via servanto."

"Mi ne koleras," respondis la princo. "Faru laŭ via plaĉo. Mi respektegas vin promeson." Kaj li ridis pli laŭte ol la antaŭan tagon.

La rabeno pasigis duan tagon en sia ĉambro apud la ĝardeno ploregante kaj preĝante. Sed, kiam la suno estis malleviginta malantaŭ la montetoj, la princo denove staris antaŭ li, kaj diris: "Mangu



nun, ĉar vi devas malsati. Via promeso estas multe malgajiganta." Kaj li prezentis al li viandajojn.

Johonano sentis grandan mangbezonojn, sed li preĝis interne al la sinjoro, kaj la tento malaperis, kaj li respondis: "Pardonu min la trian fojon, sinjoro. Mi refaris mian promeson."

"Ĝi estu tiel!" diris la alia. "Vi levigu, kaj sekvu min."

La princo prenis torĉon, kaj kondukis la rabenon tra granda parto de sia palaco, al pordo de vasta ĉambro, kiun li malfermis per ŝlosilo prenita el niĉo en la muro. Enirante la ĉambron, Johonano ekvidis ke ĉio, planko, plafono, muroj, eĉ la sojlo de la pordo estas el arĝento. La kurioze skulptata plafono, kaj la bordoj de la muroj brilis en la torĉlumo, kvazaŭ ili estus fantazia frost-disegno. En la ĉambromezo estis amasoj da arĝentaj moneroj en grandegaj urnoj el la sama metalo, plenigitaj ĝis la randoj.

"Vi faris al mi servon," diris la demono. "Vi prenu de tiu ĉi mono tiom, kiom vi volas, eĉ ĉion!"

"Mi ne povas, sinjoro," diris Johonano, "vi petis min veni tie ĉi pro la nomo de Dio, kaj mi venis pro tiu nomo, kaj ne pro pago aŭ rekompenco."

"Sekvu min," diris la princo, kaj Johonano sekvis lin en alian ĉambron. Ĝi estis el oro, kiel la unua estis el arĝento. Ĝia ora tegmento estis subtenata de oraj kolonoj starantaj sur ora planko. La trezoroj de la reĝoj de la tero ne estus povintaj aĉeti unu el la dudek kvar vazoj da oraj moneroj, kiuj estis metitaj en ses vicoj laŭlonge la ĉambro.

Ne estas miro, ĉar ili estis plenigitaj per la senĉesaj laboroj de la demonoj de la mino.

La koro de Johonano estis tuŝita de avareco vidante la oron brili en la flava torĉlumo, kiel la aŭtuna suno. Sed Dio helpis lin kontraŭbatali.

"Tiu ĉi vazoj estas viaj," diris la demono, "unu el ili ja faris vin pli riĉan ol la plej riĉa homo, sed mi al vi donas ĉiujn."

Sed Johonano rifuzis denove. Tiam la princo de la Mazikenoj malfermis la pordon de tria ĉambro, nomata la diamanta ĉambrego. Enirinte ĝin, la rabeno ekkriis laŭte, kaj metis siajn manojn antaŭ la okulojn, ĉar la brilo de la diamantoj blindigis lin, kvazaŭ li estas rigardanta la mez-tagan sunon. En agataj vazoj estis amasigitaj sennombraj diamantoj; la plej malgrandaj el ili estis pli grandaj ol kolomb-ovo. Sur alabastraj tabloj trovis sin ametistoj, topazoj, rubenoj, beriloj, kaj aliaj multekostaj juveloj, mirinde laboritaj per la manoj de lertaj metiistoj.

La ĉambro estis lumigitaj de karbunklo, kiu disjetis lumon pli brilan ol la radioj de la suno, sed pli freŝiganta ol la brilo ĝentila de la luno,

Tio estis grava tento por la avara rabeno, sed li estis fortigita de supre, kaj rifuzis denove.

"Mi ekvidas, ke vi konas min, Johonano, filo de Ben-Davido," diris la princo. "Mi estas demono, kaj volis tenti vin por pereigi vin. Sed, tial ke vi rezistis tiel longe, mi ne vin tentos plu. Estas ankoraŭ alia ĉambro, kiun vi devas vidi."

Kaj Johonano, kiu estis ferminta la okulojn kaj fervore preĝis al la Sinjoro batante sian bruston, lin sekvis.

La ĉambro, kiun la rabeno nun eniris estis tute malsama je la aliaj. Ĝi estis malvasta kaj malriĉa, sen mebloj. Sur la malpuraj muroj pendis senombraj aroj da rustigitaj ŝlosiloj. Inter ili, Johonano ekvidis kun miro la ŝlosilojn de sia propra domo, kiujn li estis kaŝinta je sia foriro, kaj li fikse rigardadis ilin.

"Kion vi vidas," diris la demono, "ke vi rigardas tiel fikse? Ĉu li, kiu rifuzas arĝenton kaj oron, povas esti ekscitata de rusitiginta ŝlosilaro?"

"Ili estas miaj," respondis la rabeno, "kaj mi akceptos ilin, se vi prezentas ilin al mi."

"Vi do prenu ilin," diris la demono, metante ilin en lian manon.

"Vi povas foriri. Sed, rabeno, kiam vi estos reveninta en Kajron, malfermu ne nur vian domon, sed ankaŭ vian koron. Tial ke vi ne malfermis ĝin antaŭe, mi havis povon super vi. Estas bone, ke vi faris unu bonaĵon sen pago, ĉar tio savis vin. Vi ne estu pli longe Johonano la Avarulo!"

La rabeno klingis sin ĝis la tero, kaj laŭdis la Sinjoron por sia liberigo.

"Sed kiel mi povas iri returnen? Mi ne scias la vojon."

"Fermu viajn okulojn," ordonis la princo.

Li faris tiel, kaj post momento li aŭdis la voĉon de la demon-estro ordonante lin malfermi ilin denove.

Kaj li sin trovis antaŭ sia domo en Kajro, kun la ŝlosiloj en la mano.

Retrovinte sin de sia surprizo, kaj dankinte la Sinjoron, li malfermis sian domon, kaj ankaŭ sian koron.

Li donacis almozojn al la malriĉuloj, la ĝojigis la korojn al la vidvinoj, kaj helpis la malfeliĉajn.

La fremduloj ĝuis lian gastamon kaj lia monujo estis al la servo de ĉiuj bezonantoj. Lia vivo estis senfina bonfarado, kaj la beno de Dio estis kun li. La homoj miris kaj diris: "Ĉu tiu ĉi viro ne estas nomata rabeno Johonano, la avarulo? Kio kaŭzas la ŝanĝon?"

Kiam la rabeno aŭdis tion, li kunvokis siajn amikojn, kaj konfesis sian antaŭan amon por la mono, kaj la danĝeron al kiu tio kondukis lin.

Li rakontis al ili ĉion, kion mi ĵus rakontis al vi.

Kaj saĝuloj, kiuj estis verkistoj, skribis lian rakonton por la memoriĝo de la posteuloj, por ke ili profitu je ĝi.

## KOLONIIGADO EN AMERIKO.

Major-General George Cox.

Antaŭ ĉirkaŭ kvardek jaroj, mi vojaĝis en Nord-Ameriko, kaj dum miaj vagadoj alvenis ĉe la ĉefurbo New York, kie mi restis kelkajn semajnojn. En unu tago, ne havante ion speciale por fari, mi promenatis el mia hotelo, kaj, trovante min apud la stacidomo, mi eniris.

Sur la trotuaro staris granda amaso da homoj kaj infanoj.

“Kio okazas,” mi diris, kiel mi pensas, al mi mem, sed ŝajne, mi estis parolinta laŭte, ĉar voĉo ĉe mia kubuto ripetis la vortojn.

Mi turnis min, kaj vidas apude, belan, hardan junulon, kiu, de lia mieno kaj vestaĵo, estas evidente Amerikano.

“Kio okazas,” diris li, “ĉu vi volus sciigi, fremdulo, kion signifas tiu ĉi amaso?”

“Jes,” mi respondis, “ĉar ŝajnas al mi, ke oni ne vidas kutime tiom da homoj, viroj, virinoj kaj infanoj kunvenantaj en stacidomo, escepte ke io neordinara okazas.”

La junulo ridanta, videble pro mia nescio, diris, “Nu, fremdulo, mi divenas ke ni estas aro da koloniistoj forirontaj por loĝigi en la Ŝtato Colorado, kaj mi divenas, ke ni estas tiel mem-

stara grupo, kiel iam lasis New York por la Okcidento. Ekzemple, tiu viro tie; nu, mi divenas ke li malfermos sekkomercaĵan magazeno; tiu ĉi estas nia pastro; tiu estas nia drogisto; tiu ĉi, nia kuracisto; tiu, nia advokato; tiu maljunulo tie, estas ĵugisto (ĉiuj el ni, laŭvice, estos la ĵugantaro!)” li diris kun rideto, parenteze.

“Tiu grupo dekstre (vi vidas ke la viroj havas nek vangharojn nek lipharojn), nu, ili estas aktoroj por nia nova teatro. Ĉu vi ne pensas ke nia grupo estas modere plena?”

“Jes,” mi respondis. “Sed kion vi estas farontaj per tiu maljunega kaj malfortega sinjoro, apoganta sin sur bastono? Ne ŝajnas al mi ke vi povos multe uzi lin?”

La Amerikano rigardis min momente, kaj siaj okuloj briletis humore dum li parolis:—“Nu, fremdulo, mi divenas, ke tiu maljunulo estas la plej gravega in-di-vi-du-o el nia partio; mi divenas ke ni malfermos nian novan tombejon per li!!! Sed, pardonu al mi, mi devas helpi lin eniri en la vagonaron; estus domaĝe lin perdi antaŭ ni alvenos en Colorado! Adiaŭ!”

## R E V O .

Origine verkita de G. Kolowrat (St. Petersburg).

Nokto. Mara bruoj. La ondoj kun terura ĝemo per sia unutona krio kvazaŭ plendas, kvazaŭ nekonsoleble ploregas.

Unu ondo volas atingi alian; ili rapidas, ili kvazaŭ kuras al voko de la ŝtonegoj; sed ve! tiuj ĉi trompis, anstataŭ ol karesi ili pereigas ilin, kaj ili senespere disbatite revenas al siaj kolegoj, eble por reunuigi por ataki la ŝtonegojn. Vane! Ili alportos nenian doloron al la masivaj grandeguloj. Ree ili ploras. Ree ili ĝemas, timigante la animon, suferigante ĝin.

La steloj malgaje rigardas, kvazaŭ simpatiante al la ondoj, volante helpi en ilia sencela batalado.

Nigraj ĉirkaŭlinioj de la bordo, nedetruablaj malafablaj ŝtonegoj ankorataj pli sopiras kaj oni ekvolas foriri el tiu ĉi sufoka atmosfero; oni volas forkuri, ekkrii kaj samtempe sentas ke tio ĉi estus sencele, sensekve, kaj oni submetas sin al la naturo, vidante sin senforta por bataladi.

Ŝi sidis tie, sur la bordo, kaj pensis pri li.

Li forveturis militon, kaj ne estas sciata, ĉu li

revenos viva. Ŝi estas lacigita de longa atendado, de longa nesciado. Ŝi ekrevis.

Al la lacigita animo en ŝia prezento aperas li, gaja post milito, post venko, post ricevo de rekompenco. Li alkuras, ĉirkaŭprenas ŝin, ridetas, kisas. Ŝi sentas sin feliĉa.

Al ŝi ŝajnas, ke la ondoj pro troeco da sentoj gaje bruas por festi lian revenon kaj ĝoji ŝian feliĉecon. Ke la steloj gaje ekrigardas ŝin, volante ĵeti sin de la ĉielo por plenigi ŝian feliĉecon, por lumigi, por ĉirkaŭpreni ilin.

Al ŝi ŝajnas, ke la ŝtonegoj kareseme altiras siajn manojn, kaj ĉio volas kuniĝi en unu sento, en unu formo, en unu sono.

Ŝi revis ke . . .

Sed subite ŝi reekkonscias, kaj eksentas la teruran realecon. Ŝi komprenas, ke ĉio ĉi estis revo, kaj ŝi ektimas, ekkrias, esploras.

Ŝi ekaŭdas la terurajn frapojn de la batalantaj ondoj, ŝi envidis la mokemajn rigardojn de la steloj, ŝi rimarkas la minacajn formojn de la ŝtonegoj kaj falas kun teruro, bedaŭrante la momentan revitan forflugintan feliĉecon.

## NIAJ VILAGAĴAJ SPORTOJ.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Unu el la plej amuzigaj okazaĵoj, kiujn mi estas vidinta, okazis dum la ĉiujaraj sportoj de nia vilaĝo. Inter la diversaj eroj sur la programo de amuzaĵoj, k.t.p., estis unu por la knaboj, kiuj havis nur dek ses jarojn kaj oni donacis grandan premion al la gajnanto.

Oni estis elmezurinta antaŭe longan kurejon sur la kampo, kaj meze de ĝi oni alligis per la kvar anguloj, grandan veldrapon. Ĉiuj knaboj kiuj deziris partopreni en la amuzaĵo devis demeti siajn botojn kaj jakojn kaj ilin meti amase ĉe la malproksima flanko de la veldrapo.

Tiam la knaboj sin aranĝis ĉe la komencaloko kaj oni donis al ĉiuj el ili novan (duonpencan) bunon kaj botelon da ŝaŭmanta limonado.

Ĉe antaŭaranĝita signalo ili devis gluti la bunon kaj limonadon kiel oble plej rapide. Tuj kiam unu estas fininta oni lin permesis ekkuri tra la kurejo.

Mi neniam forgesos la diversajn metodojn, kiujn la knaboj uzis por rapide malaperigi la nutraĵon. Iuj el ili premegis la bunojn per la malpuraj manoj ĝis ili ŝajnis tiel nigraj kolbasetoj. Tiujn ĉi apetitdonaĵojn ili penis gluti en tute sed la rezultatoj ne estis ĉiam kontentigaj. Sed alia knabo enpuŝis sian tutan bunon en unu vango kaj la botelan nazeton en la alia vango. Tiam okazis eksplodon ĉar la limonado enŝaŭmadis en la buŝon

pli rapide ol li povis gluti kaj elŝovis la bunon. Kiel siaj kunuloj ekridegis! Kiel ili tedis lin! Sed sentimige, li reenmetis la duonmaĉaĵon en la buŝon, kaj sin preskaŭ sufokinte, li triumfis. Tiam komencis la kuro. Kiam ili alvenis al la veldrapo ili devis rampi sub ĝin, kaj estis tiel malluma tie, ke multaj, senintence piedfrapinte la malantaŭajn amikojn (kaj ricevinte ree multajn frapojn) fariĝis tiel konfuzaj, ke fine ili elrampis ĉe la fino, kie ili eniris kun ruĝegaj, ŝvitaj vizagaĵoj. Sed la aliaj kiuj eliris al la prava fino ne povis trovi tuj siajn proprajn vestaĵojn. Ili aperis kiel aro de kortbirdoj, skrapanta sur amaso da cindroj.

Tamen, post mallonga tempo ili sin vestis kaj per la restanta energio, atingis la gajnstangon. Alia amuzaĵo, kiu kaŭzis multan ridadon inter la rigardantoj estis la kupto de porketo, kiun oni antaŭe ŝmiris per sapo.

Oni permesis nur la junajn edzinojn kunkuri por la porketo, sed lia haŭto estis tiel glata ke neniu povis lin teni, kaj li kuris timegige blekanta inter la rigardantoj; disjetanta teren kelkajn kiuj ĝenis lin.

Sed la amuzaĵo daŭrigis ĝis unu edzino (kun elstaraj dentoj) dum la interpuŝo, falis sur la porketo, kiu estis laciĝinta, kaj lin kaptis.

Voĉo apude ekkriis: "Ho! Nia Mario lin estas kaptinta per siaj dentoj."

## PLUVA TAGO.

J. Parisot (Vosges).

Timema knabino rapidas  
Trairi la densan arbaron;  
Korbeton portante, ŝi gvidas  
La hejmen irantan kapraron.  
Sed kapon skuetas la pino,  
Dum blovas vent' florojn ŝirante.  
Ho! zorgu pri l' korbo, knabino:  
Forŝtelos ĝin vento blovante.  
La vojo nun ŝajnas malklara  
Kaj tere filikoj elpendas;  
Ĉielo fariĝas nubara.  
Malfruan kapraron ŝi plendas,  
Dum interplektatan branĉaron  
Disligas, la manojn vundante.  
Ho! zorgu orflavan la haron:  
Forŝtelos ĝin dornoj ludante.  
Fulmeg' malproksime brilegas,  
Gutetoj ekfalas, kaj bruas  
Tondrego, kaj pluvo zumegas,  
Akvego tra l' vojo defluas;

En koto glitetas la plando,  
Venteg' l' antaŭtukon skuante.  
Ho! zorgu, knabin' pri l' rubando:  
Ĝin ŝtelos venteg' forflugante.  
Pro ĉia brueto, l' orelon  
Vekanta, tuj preskaŭ ŝi svenas.  
Sed, kiu ĉi tien, ombrelon  
Portante, kaŝate alvenas?  
Ha! ŝia jam pasis timeto:  
Ŝi ridas, fianĉon vidante.  
Ho! zorgu, knabin', pri l' rideto:  
Ĝin ŝtelos l' eĥo' forirante.  
Jen li fianĉinon manpremis;  
Ŝi lin aŭskultadis revante;  
Sed jam ne pro l' vento eltermis  
L' ombrelo nun ambat' kovrante.  
Se ne la ombrelo mensogis,  
Pasadis la horo tre dolĉe;  
Knabino pri l' koro ne zorgis  
L' ombrelo ĝin ŝtelis ensorĉe.

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

Treege interesa mi trovis la konversacion de la pastro, kies memoro estas tiel kiel profundega puto; puto en kiun mi ofte mallevis mian sitelon por ĉerpi laŭ mia mezuro la akvon de lia iom stranga sed ĉiam interesa sciado.

Ke tiu sitelo gutetas; ke mi ne povas detale aŭ tute akurate revenigi en memoron liajn rakontetojn estas, mi bone scias, maljustaĵo kontraŭ vera klerulo. Sed la akvo kiu dum multaj jaroj estas restinta en la ujo de mia cerbo ne povas esti tute same kiel kiam mi ĝin freŝe ĉerpis el la viva fonto. Eble ĝi malklarigas; eble mi kunmiksas iom da forgesado. Sed malgraŭ tio mi penos rakonti almenaŭ unu el la klarigoj, kiujn mi ĉiutage, preskaŭ ĉiuhore ricevis.

Mi estas nominta la urbon Chicago, kiam ekdiras la pastro: "Ha, tiu nomo havas iom strangan devenon. Sed sendube vi jam scias pri tio!"

"Sendube ne," mi respondas. "Mi estas grandega nesciulo. Plie mi havas grandan emon por la aŭskultado. Volu tial min instrui, mi petas."

"Antaŭ la Ŝtatoj anoncis sian sendependon," li komencis, "dum tiu milito de la Angloj kontraŭ la Francoj, kiu decidis la posedon de la Okcidentaj Ŝtatoj, ambaŭ kontraŭbatalantoj tre uzadis kiel spionistojn kaj antaŭmarsantojn la tribojn Indianajn."

Tagon, apud la lago *Erie* la spionistoj de la Angloj raportis ke ili ekvidis haltejon de la malamiko; kiun la Angloj decidis ataki.

Sed lertege estis ankaŭ la spionistoj de la malamiko. Kiam alvenis la soldatoj Anglaj ili vidis nur kelkajn fugantajn Indianojn.

Post tiuj fugantoj tuj sin ĵetis, per flugantaj piedoj, la Indianaj kunbatalantoj de la Angloj, kriegantaj per triumfaj voĉoj: "*Ŝi-ka-go; Ŝi-ka-go*"; kiu signifas en ilia lingvo, "*Indianoj kuras; Indianoj kuras*."

Poste oni konstruis sur la sido de la haltejo ŝtipan fortikaĵeton, kiun oni nomis pro la kriego de la Indianoj *Ŝi-ka-go* (Chicago).

Loĝigis apud la fortikaĵeto loĝigantoj, kaj jen la komenco de la konata urbo.

Bedaŭrinde oni nuntempe nur malofte ekvidas la ŝtipajn dometojn de tiuj unuaj loĝigantoj; dometojn kiuj tre malmulte similas al la lignaj domoj kiujn mi supre priskribis, kaj kiujn oni konstruas el tabuloj, alfiksitaj tiamaniere ke ĉiu el ili estas superkuŝita per la malantaŭa flanko de la supre lokita tabulo, laŭ maniero de ardezoj sur tegmento.

Ne! Tiuj Unuevenintoj uzadis ne tabulojn, sed tutajn arbtrunkojn, krude per hakilo kvadrigitajn, aŭ eble laŭlonge segitajn kaj tiamaniere kunmetintaj ke la rondflanko estu ekstere, kaj interne la plata supraĵo. Ili konstruis kvar nerompitajn murojn kaj poste trahakis aŭ trasegis la truojn por la pordo kaj fenestroj: Ĉiujn interspacojn ili plenigis per koto; kaj tiamaniere faris konstruaĵon treege fortikan kaj multe pli varman ol la nunaj lignaj domoj. Tamen ĉar ili dehakis kaj tuj uzis la arbojn post nelonge la freŝa (verda) ligno malpliigis, kaj oni devis ofte renovigi la kotan plenigaĵon.

Mi vizitis farman domon kies la multaj aldonoj estis el tabuloj, tamen ankoraŭ restis la, laŭ Amerikaj ideoj, *antikva* ŝtipa dometo, kiu estis, laŭ mia opinio, la plej dezirinda porcio de la domo. Kiel kutime, ĝi enhavis du ĉambrojn; mango-kaj dormo ĉambro.

En la dormĉambro proksime de la planko troviĝis iom granda truo.

"Pro kio servas tiu ĉi truo?"

"Ho, la ŝtipoj malpliigis, kaj la koto estas forfalinta."

"Kial ne ankoraŭ ĝin kovri. Tra tia malfermaĵo povus tre facile eniri serpento."

"Ho, jes; antaŭ nelonge unu eniris."

"Kaj post tia okazo vi ne ŝtopis la truon!"

"Ho, ne; sed ni mortigis la serpenton."

"*Kutimo naskigas malestimon!*"

Amerikoj ŝajne rigardas serpentojn kiel ridindaĵoj; preskaŭ mi diris amuziloj.

Eĉ la nudpiedaj knabetoj saltas sur ilian korpon kaj per batego de la nuda kalkano mortigas ilin. Eble tio ŝajnas esti danĝera amuzaĵo, sed por la salto oni celas tiun porcion de la serpenta korpo kiu, se tiuj rampaĵoj havus kolojn, estus la kolo; kaj tiamaniere subpremate serpentoj estas senpovaj por vundi.

Plie ne ĉiuj serpentoj estas atakemaj kiel bone certigas la sekvanta memoraĵo:—

Preskaŭ mi estis nudpiedulo, ĉar mi havis sur la piedoj nur malpezajn sandalojn (ledplandojn kun ledrimenoj). Ŝtrumpojn mi tute ne portis kaj de la ĝenuoj ĝis la piedoj la kruroj estis tute nudaj, ĉar mi sunbanis en Aŭstrujo.

Antaŭ la *Luft Hütte* (aerbudo) en kiu mi dormas estas herbejo, sur kiu mi promenas. Hodiaŭ ĉar pluvus mi kunportas pluvombreton.

Subite mi ekaŭdas siblon koleregan. Mi mal-

suprenrigardas. Preskaŭ tuŝante mian piedon mi vidas la kapon de malgranda sed venemega serpento kies lango en kaj el iradas la buŝon laŭ nekredibla rapideco. Mi pensas ke eĉ la dikeco de arfolio estus plenigita la spacon inter la elstreĉita lango kaj la haŭto de mia piedo. Terurigite mi restas senmova kiel ŝtonego. Krom sia lango la serpento restas egale senmova, kaj dum kelka tempo ni rigardadas unu la alian. Tiam, subite, ĝi forĵetas sin; forrapidegante per grandegaj kurboj.

Tiel rapide ĝi forrampis, ke la herbo fajfis de ĝia traŭro!

“Li kiu mortigas serpenton,” diras Aŭstra kredo “mortos mem antaŭ pasas unu jaro.”

Se mi estus atakinta tiun serpenton (kaj se mi estus portinta armilon pli konvenan ol malfermita pluvombrelo, kredible mi estus tion farinta) mi kredas ke ne estus por mi necese atendi la finon de la jaro. Mi ja estus mortinta tiun saman tagon.

Foje en Egiptujo mi levis de la tablo gazeton kaj malkovris skorpion, kaj en Italujo — sed ne; mi skribas nun miajn *Amerikajn* memorojn.

Resaltegas la vaganta penso kaj ankoraŭ mi sidas en la ligna salono de la Amerika pastrejo, kaj jen pluvos, senĉese pluvos.

En mia cerbo ripetas sin, sekvante la sonon de

la pluvgutoj sur la fenestroj, frazo kiun mi legis en Amerika libro kaj kiun mi ne plene komprenis.

“*Li ne scias sufiĉon por eniri de la pluvo.*”

La pordo malfermas kaj eniras tri geinfanoj, knabo kaj du knabinoj.

Estante Amerikoj ili estas neniel hontemaj, faras sin tute kvazaŭ en sia propra domo, babiladas senĉese pri multaj aferoj, kaj kiam alvenas la horo de tagmango, tagmanĝas kun ni.

Posttagmeze la pluvo ĉesas kaj ili foriras.

“Mi volus ekscii,” diras la pastredzino, “kies geinfanoj ili estas.”

“Ĉu vi ne konas ilin?” mi demandas.

“Ne, por mi ili estas tute fremduloj.”

“Sed tre senceremonie ili eniris vian domon.”

“Nature, ĉar pluvus.”

“Sed — ĉu vi intencas diri ke *iu ajn* eniros *ies ajn* domo kaj tie tagmanĝos, nur ĉar pluvos?”

“Jes, certe; kial ne? Ili estis treege bonvenaj, kaj nature oni sin ŝirmas de la pluvo.”

“*Li ne scias sufiĉon por eniri de la pluvo.*”

Ankoraŭ mi aŭdis la rekantaĵon, sed nun mi ĝin komprenis; mi estas vidinta la Amerikan gaste-mecon.

La Amerikan senceremoniecon — sed pri tio mi parolos en alia fragmento.

## PROTEKTO DE ANGLO.

Vera rakonto de Edw. Gauntlett (Okayama).

Tage, en la somero de 18— mi komencis longan promenon kune kun la juna homo Japana kiu tiutempe min instruis je la malfacilega Japanlingvo. Mi intencis unue iri en Ikao'n, kie estas elfuaĵoj de varmakvo minerala. Ikao similas je Clovelly, en Devonshire, escepte ke ĝi estas alta, kaj inter altaj montoj, Clovelly estante apud la maro.

Estis necese ke ni iru per vagonaro de Tôkyô, la ĉefurbo, ĝis Maebashi urbo, kaj de tie, per malgrandega tramo al la vilaĝo Shibusawa. Poste oni marŝas, aŭ rajdas en *jinrikisha* (hontirata kaleŝo) ĉirkaŭ dek-kvin mejloj ĝis Ikao. Tamen, kiam ni alvenis je la stacidomo de la tramo en Shibusawa, subite ekpluvegis, kaj ĉirkaŭ du horojn, kiam ni restis en la stacidomo, pluvegis kaj tondregis. Post la pluvego, mi ekiris, kiam la homo kiu tiris la “*jinrikishan*” en kiu estis miajn pakaĵojn, sciigis nin ke estis necese ke ni havu du virojn por la *jinrikisha*, ĉar li kredas ke sur la montoj, la vojo estus difektigita per la pluvo. Ni konsentis kaj ekmarŝis. La *jinrikisha-viro* prava estis, ĉar, post ke ni marŝis ĉirkaŭ ok mejlojn, ni vidis ke ponto estis duondifektigita.

Nun ekmallumiĝis, kaj ni eniris nebuleton; sed ni marŝadis, kaj amike paroladis. Mi nun ekvidis

ke virino nin sekvis, kaj, ĉar ŝi persiste nin sekvis, mi diris al S<sup>ro</sup> Kôsaka, mia instruisto:

“Demandu al ŝi kial ŝi nin sekvas.”

Li tiele demandis, kaj diris al mi ke ŝi diris ke ŝi timis esti ensorĉata per vulpoj aŭ meloj, kaj ke ŝi sciis ke malsamlanduloj neniam ensorĉiĝis per ia besto.

Mi ridetis, sed diris ke mi estus feliĉa ŝin protekti. Ŝi nin sekvis ĝis la hotelo kaj tiam subite malaperis.

La sekvantan tagon matene frue, la servanto de la hotelo venis al mia ĉambro kaj diris ke iu deziris paroli kun mi. Mi surpriziĝis, kaj diris al S<sup>ro</sup> Kôsaka:

“Subiru, mi petas, kaj vidu la homon kiu venis min vidi. Mi kredas ke eble estis eraro de la servanto. Mi kredas ke neniu scias ke mi estas en Ikao.”

Li iris, sed baldaŭ revenis, kaj diris ke estis vere: iu deziris paroli kun mi.

Mi iris al la pordego, kaj tie mi vidis la virinon kiun mi “protektis” la antaŭan tagon! Ŝi subfleksis la kapon—mem la korpon—kaj diris:

“Mi vin dankegas, Sinjoro, por via bona protekto. Mi bone sciis ke, se mi penis veni tien ĉi sole, la vulpoj aŭ la meloj min ensorĉus.”

## SUR LA GLACIO.

El "la Dokumentoj pri Pickwick," de Dickens, tradukita de A. A. Cowan.

Maljuna Wardle kondukis ilin al sufiĉe granda frostita lageto, kaj kiam la "grasa knabo" kaj S<sup>ro</sup> Weller estis forsovelintaj kaj forbalaintaj la neĝon kiu estis falinta dum la nokto S<sup>ro</sup> Bob Sawyer aranĝis siajn glitilojn per lerteco kiu al S<sup>ro</sup> Winkle ŝajnis perfekte mirinda, kaj faris rondojn per sia maldekstra kruro, kaj la cifero 8, kaj enskribis sur la glacio, ne unufoje haltante por spiri, multajn aliajn plaĉajn kaj mirigajn devizojn je la treega kontentigo de S<sup>ro</sup> Pickwick, S<sup>ro</sup> Tupman kaj la sinjorinoj, kiu atingis pozitivan entuziasmon, kiam maljuna Wardle kaj Benjamin Allen kune kun la antaŭnomita Bob Sawyer, faris kelkajn misterajn evoluciojn kiujn ili nomis *Skota danco*.

Dume, S<sup>ro</sup> Winkle (sia vizaĝo kaj siaj manoj bluiĝis per la malvarmo) estis devigata bori en siajn ledplandojn kaj surmeti siajn glitilojn, la pintoj poste, kaj faris la rimenojn tre implikajn, helpata de S<sup>ro</sup> Snodgrass, kiu sciis malpli pri glitilo ol Hindu.

Fine, tamen, helpate de S<sup>ro</sup> Weller, la malfeliĉaj glitiloj estis firme surŝraŭbataj kaj surbukatoj kaj S<sup>ro</sup> Winkle levigis.

"Nun, Sinjoro," diris Sam, per kurigiga voĉo, "foriru kaj montru al ili, kiamaniere ĝin fari."

"Haltu, Sam, haltu," diris S<sup>ro</sup> Winkle, kiu tremis forte, kaj ekkaptigis la brakojn de Sam je la premo de dronoto.

"Kiel glate estas, Sam!"

"Kutima stato de glacio, Sinjoro," respondis S<sup>ro</sup> Weller. "Tenu! Sinjoro."

Tiu ĉi lasta rimarko de S<sup>ro</sup> Weller rilatis je pruvo kiun S<sup>ro</sup> Winkle faris, je la momento, de furioza deziro por ĵeti siajn piedojn en la aeron, kaj fragegi la postan flankon de sia kapo kontraŭ la glacio.

"Tiu ĉi—tiu ĉi—estas tre mallertaj glitiloj! Ĉu ili ne estas Sam?" demandis S<sup>ro</sup> Winkle, ŝanceliĝe.

"Mi timas ke malvigla sinjoro estas sur ili, Sinjoro," respondis Sam.

"Nun, Winkle," kriis S<sup>ro</sup> Pickwick, tute nekonscia ke io estis malprava.

"Venu; la sinjorinoj atendas vin."

"Jes, jes," respondis S<sup>ro</sup> Winkle je timegiga rideto, "mi veras."

"Jam, komenconta," diris Sam, penante por liberiĝi.

"Nun, Sinjoro. Ekiru!"

"Haltu momente, Sam," spiregis S<sup>ro</sup> Winkle, tenante lin tre amante. "Mi trovas ke mi havas du

vestojn hejme kiujn mi ne bezonas, Sam. Vi povas ilin havi, Sam."

"Mi dankas vin, Sinjoro," respondis Sam.

"Ne atentu por tuŝi vian ĉapelon, Sam," diris S<sup>ro</sup> Winkle rapide. "Vi ne bezonas forpreni vian manon por tiun fari. Mi intencis doni al vi 5 ŝilingojn hodiaŭ matene por Kristnaska donaco, Sam. Mi donos ĝin al vi posttagmeze, Sam."

"Vi estas tre bona, Sinjoro," respondis S<sup>ro</sup> Weller.

"Tenu min komence, Sam," diris S<sup>ro</sup> Winkle.

"Nun—tiu estas prava. Mi kutimiĝos baldaŭ, Sam. Ne tro rapide, Sam! ne tro rapide!"

S<sup>ro</sup> Winkle kurbigante antaŭe, sia korpo faldita duone, estis helpata trans la glacio de S<sup>ro</sup> Weller, je tre stranga kaj negracia maniero, kiam S<sup>ro</sup> Pickwick kriegis senkulpe de la kontraŭa bordo—"Sam!"

"Sinjoro?" diris S<sup>ro</sup> Weller.

"Tien ĉi, mi bezonas vin."

"Liberigu min, Sinjoro," diris Sam, "ĉu vi ne aŭdas ke la mastro vokas. Liberigu min, Sinjoro!"

Per fortega peno, S<sup>ro</sup> Weller liberiĝis el la premo de la agonio Pickwickano, kaj tion farante, donis grandegan antaŭenpuŝon je la malfeliĉa S<sup>ro</sup> Winkle. Per akurateco kiun nenia grado de lerteco aŭ pratiko povis certigi, tiu malgaja sinjoro iris rapide en la mezo de la *Skota danco*, je la preciza momento, kiam S<sup>ro</sup> Bob Sawyer faras svingon de neegala beleco. S<sup>ro</sup> Winkle frapas forte kontraŭ li, kaj kun laŭtega bruo, ili falis peze glaciene.

S<sup>ro</sup> Pickwick kuris al la loko.

Bob Sawyer estis leviginta, sed S<sup>ro</sup> Winkle estis multe tro saĝa por tion fari sur glitiloj. Li estis sidanta sur la glacio, faranta spasmajn penojn por rideti; sed dolerego estis pentrata sur ĉiuj siaj trajtoj.

"Ĉu vi estas vundata?" demandis S<sup>ro</sup> Benjamin Allen, kun granda maltrankvileco.

"Ne multe," diris S<sup>ro</sup> Winkle, frotante sian dorson.

"Mi volas ke vi permesas min tiri sangon el vi," diris S<sup>ro</sup> Benjamin Allen, tre avide.

"Ne, mi dankas vin," respondis S<sup>ro</sup> Winkle, rapide.

"Mi vere pensas ke vi devus," diris Allen.

"Mi dankas vin," respondis S<sup>ro</sup> Winkle. "Plivole ne."

"Kion vi pensas, S<sup>ro</sup> Pickwick?" demandis Bob Sawyer. S<sup>ro</sup> Pickwick estis ekcitata kaj indigna. Li signodonis je S<sup>ro</sup> Weller, kaj diris per severega voĉo: "Demetu liajn glitilojn."

“Ne; sed mi vere estis apenaŭ komencinta,” kontraŭdiris S<sup>ro</sup> Winkle.

“Demetu liajn glitilojn,” ripetis S<sup>ro</sup> Pickwick, firme.

La ordono ne povis esti kontraŭbatalata. S<sup>ro</sup> Winkle silente permesis al Sam obei.

“Levu lin,” diris S<sup>ro</sup> Pickwick. Sam helpis lin leviĝi. S<sup>ro</sup> Pickwick iris kelkajn paŝojn for de la rigardantoj, kaj signodonis sian amikon ke li

proksimiĝu, fiksis serĉantan rigardon je li, kaj ekparolis per mallaita, sed klara kaj akcentega voĉo, tiujn ĉi remarkindajn vortojn.

“Vi estas ŝajnigulo, Sinjoro.”

“Kio?” diris S<sup>ro</sup> Winkle, ekstremante.

“Ŝajnigulo, Sinjoro. Mi parolos pli simple, se vi volas ĝin. Trompanto, Sinjoro.”

Je tiuj ĉi vortoj, S<sup>ro</sup> Pickwick turnis sin malrapide kaj rekunigis siajn amikojn.

### AVIZO.

Pro mia libertempo, mi ne povas doni la kutiman raporton *Monato post Monato*.

Mi esperas, ke la Legantoj ne malkontentigos pri tio.

Proksiman monaton la raporto eble estos *tro longu!*

H.B.M.

### VERA HISTORIO DE FANTOMO. Originale verkita de Esp. 10549 (Nova Zelandano).

Antaŭ nemultaj jaroj la Nova Zelanda urbeto Arrowtown iom ekscitigis pri senĉesaj kaj persistaj fantomaj fabeloj. Oni diradis ke ia terura blanka supernatura apero promenadis ĉiunokte en la publika tombejo. Unue, kompreneble, la pluparto da la vilaĝanoj ridetis, mokis, kaj nenion kredis pri tiaj raportoj, sed kiam, tago post tago, tiuj strangaj famoj daŭradis kaj certigis de multe da diversaj personoj, kaj eĉ de la antaŭaj mokintoj, la publika sciemo fariĝis forta kaj ĝenerala. Baldaŭ kelkaj geservantoj tute rifuzis preteriri la tombejon post mallumo, kaj la afero fariĝis enuiga kaj multe malhelpis la gemastrojn.

En la urbeto estis kuraĝa virino nomita S<sup>rina</sup> P. kiu tute ne timis supernaturaĵojn kaj ne povis kompreni la superstiĉajn timemulojn.

“Mario,” diris ŝi al unu sia amikino, “ĉu vi timas la fantomon?”

“Ne, S<sup>rina</sup> P.,” respondis Mario, ridante, “ĉar ne ekzistas tiaj kreitaĵoj.”

“Sed io estas en la tombejo, kaj mi iros hodiaŭ vespere tien por vidi ĝin. Ĉu vi volas min akompani?”

“Kion ni faros en la tombejo?”

“Ni spionas, kaj ni sciigos kio estas kiu timigas la urbetanojn.”

Mario unue ŝanceliĝis, sed fine konsentis, kaj je la dekunua horo la du sentimaj virinoj eniris la terurigan loĝejon de la mortintoj.

La nokto estis sen luno, sed la ĉielo estis hela, kaj la ĉirkaŭaĵo estis sufiĉe videbla sub la stellumo. Mario, vidante ĉie la blankajn tombŝtonojn en la palega mallumo, komencis iom tremeti, kaj preskaŭ pentis sian bravecon. Tamen ŝi ne volis esti timulino, kaj ŝi nerve penadis babilu kaj ŝerci por sin kuraĝigi, kiam subite—  
h-r-r-r-r!

Bona Dio! kio estas tio? Io nigra, nekom-

prenebla, harstariganta, leviĝas el la infero antaŭ la piedoj de la virinoj kaj flugas al la ĉielo.

Mario kriegis laŭte kaj forkuris malantaŭen tra la pordeto sur la vojon.

“Mario, revenu!” alvokis S<sup>rina</sup> P. “Malsaĝulino ridinda, revenu! Nur estas vesperto!”

Sed Mario nenion plu komprenis. Plene, senespere terurigita, la kompatinda knabino kuris rapidege sur la vojo hejmen kiel frenezulino, dum S<sup>rina</sup> P. staris tiel kolera kiel ridanta. “Nu,” pensis ŝi, “mi devos spioni sole. Sed la atendo verŝajne estos enuiga sen la junulino.”

Si antaŭiris ĝis la tombeja mezo, kaj sidiĝis post ia tombo sub ombra cipreso. Pasis kelka tempo, eble unu horo, kaj S<sup>rina</sup> P. komencis oscedi kaj perdi paciencon, kiam—jen la fantomo! Jen vere la spirito! Io granda, blankvestita, kun pala vizaĝo kiel mortinto, kviete sed rapide alproksimiĝis. Ĝi marŝis rekte al la tombo post kiu sidis la spionantino, sed tiu ĉi ne ektimis, sed senmove kaj atente observadis la aperon, suspektante ian friponan trompon. La fantomo fine haltis, kaj sen observi S<sup>rina</sup> P. metis sin genue sur la tombo kaj—preĝis! Tuj la mistero klariĝis en la vigla inteligenco de la kuraĝa kaj admirinda virino. La fenomeno ne estis fantomo, sed somnambulistino. Juna virino kiu preĝis ĉe la tombo de sia patrino. Tiam vere S<sup>rina</sup> P. treege ĝojis pri tio ke la kriema Mario forestas, ĉar la afero estis grava. Vekigi la dormantinon en tombejo estus kompreneble ago danĝera kaj kruela.

Sekve la saĝa spionantino restis senmova ĝis la knabino returnis el la tombejo hejmen, kaj tiam ŝi sekvis malproksime tra la vojo al la domo de la dormanta vagistino. La sinjorino restis ekster la domo sufiĉe da tempo por ke la knabino rekuŝiĝu, kaj tiam ŝi frapis kaj vekigis la patron por lin sciigi ke lia filino estas la terura fantomo kiu bozonas kuraciston sen prokrasto.

## MAJSTRO PASERO.

Babilado de Alfonso Wachter (Riga).

Je malklara kaj nebula printempa mateno bela pasero, kiu estas konsiderata vivan beleco de sia parencaro, flugis, kune kun sia amantino al lignejo ĉe la suba Duna kie ankoraŭ estis trankvile kaj tute dezerte en ĉi tiu frua matena horo, ĉar la lignolaboristoj, jam komencinte sian taglaboron, interrompis ĝin por matenmanĝi. Ĉi tiu matenmanĝo konsistis el seka pano, lardo kaj harengo.

Ĉi tie nia pasero tuj komencis danci siajn plej graciajn amdancojn sur la lignetoj, kiuj estis jetitaj sur la vojo por replibonigi ĝin. En sia amebrieco li nek atentis la sentaŭgan danĉplacon nek ke ŝi ne estis pruntinta ian ekvidon al li, aŭ rimarkinta liajn dancojn, sed ke ŝi serĉis sian nutraĵon senĉagrene pro lia flirtado, kaj ŝi okaze konversaciis gaje kun ĉi tiu aŭ tiu el la paser-patrinaj kiuj flugis al ĉi tiu lignejo.

Kiam, post longa tempo, Majstro Pasero fine vekigis je sia amebrieco—en malgranda malproksimeco Ho ve! Sur unu el la multenombraj staploj de trahoj en plej kara *kapo ĉe kapo* kun blanka pasero li vidis sian amatinon!

Oni ne povas esprimi per vortoj la doloron, kiun nia kompatinda pasero sentis ĉe tiu ĉi rigardo. Kaj ilia feliĉa kaj gaja pepado, kiu sonis al li kiel malica, moka ridado pri sia malfeliĉo, tranĉis profunde en sian malgrandan kaj plenanman birdakoron.

Vere, li deziris satigi sian malsaĵon je venĝo, je la sango de sia konkuranto. Li volis subigi lin en batalo ĝis morto kaj vivo. Sed tiu ĉi batalo por la posedo de la multe dezirata pasera virgulino ne estis batalata, ĉar la fiereco kondamnis batalon kun kontraŭulo kiu estis konsiderata ne egal-naskulo, kun iu, kiu estas nur vanta malsaĝulo de alia ĉarma paservirinaro, kaj ankaŭ frivola fanfarulo de la paserviraro.

Plua argumento kiun li atentis, estis ŝia nuna malkaŝa koketeco.

Li nek intencas meti sencele ilian vivon, nek detrui ŝian amafeliĉon, kiun li egoiste forprenus de ŝi se li mortigos ŝian amiston.

Tiu ĉi malegoista rifuziĝo je ŝia posedo—ŝi, kiu estis la revo de siaj noktoj, ja ne estis facila por li. Li malĝojege subfleksis sian kapeton kaj li dume restadis senmove sur la lignetoj.

La pentraĵoj de pli fruaj tagoj eble preteriris je siaj inteligentaj okuloj. Li eble memoris la tagon,

kiam li unue renkontis ŝin, kaj kiel iliaj okuloj rigardis tuj unu la alian serĉe kaj kritike, kiel rigardas sub ŝtono miozoto.

En Majo, kiam ĉio burĝonas, li renkontis ŝin sur la branĉoj de betuleto, en societo de infanriĉa paser-patrinino.

Tuj kuniĝinta kun ili kaj estanta lerta, vigla societamulo, li turnis baldaŭ la konvercacion—kiu, ĝis nun tuŝis diversajn trivialajn aferojn, ekzemple pladon, edukadon, nutro zorgojn, k. t. p.

Li lerte vivigis la konversacion, evitis ian interrompon kaj etendis ĝin kiel eble plej longe. La ombroj de la vespero jam komencis malleviĝi kiam la malgranda pepa societo fine disigis sin, por serĉi siajn nestojn.

De tiu tempo, ŝia plej fidela akompananto, li ĉiam sekvis ŝin dum ŝiaj vagoj tra urbo kaj lando, tra kampo kaj arbaro. Li faciligis kavalire al ŝi trovi orajn avenerojn kaj plej sukajn berojn.

Se malleviĝis la nokto, li zorgis pro sendanĝera restejo kaj fidele gardis ĉe ŝi.

Subite li estas vekita pro alproksimiĝantaj ligno laboristoj. Li do ŝanĝis sian ripozlokon kaj ree komencis revii. Sed li ne povis mediti longe. Paser-dando, kiu jam aŭdis pri lia malfeliĉo, kuniĝis kondolence kun li.

Silente, jes, tute apatie, Majstro Pasero sin kondutis rilate la fluo de la parolado, ĉar li konsideris, ke estus malinde respondi al la malsprita, frivola afektulo. Komprenante fine, ke lia certigo de sincera kompato ne estas sufiĉe atentita, kaj ke lia bonopinia konsilo estas rifuzita, la dando forflugis ofendinta, en lia tromemfido.

Doloriga ekĝemo ŝvelis la bruston de nia Majstro Pasero. La vana babilado de la forfluginta ŝajnis al li kvazaŭ profanado de liaj plej sanktaj sentaĵoj. Tute logike li konkludis ke, kiel tiu dando jam sciiĝis pri lia ama-malĝojo, nur tro baldaŭ la tuta mondo de la paseroj scios ĝin kaj fajfos sur ĉiuj tegmentoj. Moko kaj ŝajna kompato de nun sekvos liajn kalkanojn kaj estos lia sorto!

Sekve li decidis lasi sian patrujon, la lulilon de sia malĝojo, por eviti tiamaniere al la moko kaj kompato. Kiam li fine tion decidis kaj siajn flugilojn malfaldis por la flugo en la malproksiman fremdan landon, li ankoraŭ aŭdis la jenan rimarkon, kiun la paser-dando elparolis:

“Aliaj urbetoj—aliaj knabinetoj!”



# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- 14 fretors; 1/2 rosbila; 75 centes.

Windsor Avenue, 44, Upper Temple, London, W.C.

All Communications should be sent to THE EDITOR, at, Ashington Gardens Square, London, W.

## CONTENTS.

|                                       |     |
|---------------------------------------|-----|
| La Hungara Esperanto (Gaston Leroy)   | 144 |
| La Esperanto (Hugo H. Bonhoff)        | 15  |
| Esperanto, por ĉi (Ĉiuj)              | 16  |
| — (M. J. J. J.)                       | 17  |
| DEKRETO                               | 18  |
| THE CASE OF THE TWO CITIES (C. M. J.) | 19  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 20  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 21  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 22  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 23  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 24  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 25  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 26  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 27  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 28  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 29  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 30  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 31  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 32  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 33  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 34  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 35  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 36  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 37  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 38  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 39  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 40  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 41  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 42  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 43  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 44  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 45  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 46  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 47  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 48  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 49  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 50  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 51  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 52  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 53  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 54  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 55  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 56  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 57  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 58  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 59  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 60  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 61  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 62  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 63  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 64  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 65  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 66  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 67  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 68  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 69  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 70  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 71  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 72  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 73  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 74  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 75  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 76  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 77  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 78  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 79  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 80  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 81  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 82  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 83  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 84  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 85  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 86  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 87  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 88  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 89  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 90  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 91  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 92  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 93  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 94  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 95  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 96  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 97  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 98  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 99  |
| LA ESPERANTO DE JERUSALEM (E. J. J.)  | 100 |

## AVIZO GRAVA.

La unika firma Esperanto, laŭ la leŭ. (Londono) en la jaro 1870, prezentas sian kompletan katalogon de la Esperanto-lingvo kaj ĉiujn necesajn informojn pri ĉiuj necesaj aferoj. Ĉiuj Esperanto-lingvistoj, kiuj membri de la Esperanto-grupo de ĉiuj lingvoj, devas esti en la posedo de la katalogo. Ĉiuj katalogoj, kiuj estas aliaj, kun la Esperanto-grupo, devas esti en la posedo de la katalogo. Ĉiuj katalogoj, kiuj estas aliaj, kun la Esperanto-grupo, devas esti en la posedo de la katalogo.

BUCHANAN, SCOTT & CO.,

Canal Street,  
Glasgow, Scotland.

## The Remington

THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!  
THE INTERNATIONAL MACHINE.

Delivered by tens of thousands.  
The common bond of union of all civilized peoples.  
The Remington and its variations please the  
worldwide.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
114, DRESDENROAD ST., LONDON, E.C.

## La Remington

LA UNIVERSALA SKRIBMĈASINO.

Prezentu je via!  
LA INTERNACIA MASINO.

Tute elmonde de homoj lernas.  
La Internacia masino por ĉiuj civilizitaj popoloj.  
La Remington masino trovas sian ĉiutagistan  
aplikadon.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
114, DRESDENROAD ST., LONDON, E.C.

### ĈIUJ NI POVDOS PARADIZON IRI.

|                 |                 |
|-----------------|-----------------|
| Ĉiu homo devas. | Ĉiu homo devas. |
| Ĉiu homo devas. | Ĉiu homo devas. |
| Ĉiu homo devas. | Ĉiu homo devas. |
| Ĉiu homo devas. | Ĉiu homo devas. |
| Ĉiu homo devas. | Ĉiu homo devas. |

Ĉiu homo devas iri paradizon. Ĉiu homo devas iri paradizon.  
Sro. Ch. Johnson and Company (S. & L.) London.

## The "Review of Reviews"

Is the Best Magazine for Men's Pleasure  
And it is read by "Esperantists" Worldwide.

The aim of this Magazine is to make the best thought  
and best articles universally accessible to a reading list.  
The best and present in the magazine's pages has been  
with intelligent interest the great mass readers of the magazine  
History.

Post Free for Twelve Months, 8/6  
181, TRAFALGAR SQUARE, LONDON.

ORDER: BOOTHBY HOUSE, BOKINGHAM ST., LONDON.

### FOR SALE.

160 GLENVA BROOKWOOD GRAND PIANO  
for £50. In fine condition, Brookwood.  
For all particulars write to THE EDITOR.

### Correspondence Lessons in Esperanto

181 TRAFALGAR SQUARE  
Mr. A. BUTLER, Cardiac Teacher of Esperanto,  
181, TRAFALGAR SQUARE, LONDON, W.C.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korrespondadi.

- Sro. C. D. BROWN, Penn Buildings, Etna, Pa., U.S.A. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.  
Sro. A. BURY Librarian, 4, rue Saint Genes, Clermont Ferrand, France. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.  
Sro. O. BARNETT, 10, Avenue de Lyon, Reims, France. - Korrespondanta Esperantistoj, ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj, ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.  
Fl. MITCHELL, Acacia House, 65, Maryport Road, Camberley, London, S. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.  
Fl. F. A. MANN, 24, 1140, Stokholm-Strat, Anglujo. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.  
Sro. W. MILES, Ingemere, 39, Clifton Road, Penarth, Anglujo. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.  
Sro. UPOK FRANCOISE, Tarnacanta Halls, Elzaco, 1, Bonn, Munster, Anglujo. - Ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj.

La Karto de la Tendaro estas ĉi (ĉiujna Juna (kon. kromaj) Esperantistoj).

# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.  
AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P. O. Box 50, Auckland.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

**N.B.**

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

**N.B.**

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

20. [Vol. II., No. 6.]

JUNIO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later issues  
4d. each, net.

## MODERNA ERMITO.

Dum dudek jaroj mi estas loĝinta en malgranda urbo sur la Mediteranea marbordo, kaj mi konas tre bone la pastron, la fiŝkaptistojn, la kampanarojn, ja ĉiujn, sed nur sciigis la lastan semajnon ke inter ni kaj la plej proksima vilaĝo vivas maljuna ermito. Oftege mi estas promeninta laŭlonge la kvin kilometroj da ŝtona laciga bordo nenium renkontinte, kaj neniam iu preparolis al mi pri la stranga estaĵo pri kiu mi estas skribonta. Oni vidas tie unuflanke la krutajn montetojn kun ŝtonegoj kaj dornaj arbetoj, du aŭ tri ĝardenojn kun palmarboj kaj oranĝujoj, kaj malmulte da muroj ruinigitaj; aliflanke estas la profunda transvidebla blua maro. Sed irinte meztagmanĝi kun amiko kiu antaŭ nelonge aĉetis unu el la kulturaĝetoj kie li nun estas aklimatiganta nekomunajn kaj delikatajn arbojn kaj florojn kiuj ne povas bone vegeti aliloke, mi konatigas kun la ermito, ĉar dum ni manĝis, jen, sur la marbordo alproksimiĝas la malalta blankhara solulo, paŝanta malrapide kun siaj okuloj rigardantaj la teron.

Kio estas tio, mi demandis?

Ĉu vi ne konas la ermiton, li respondis mia amiko?

La ermito alvenis apud ni, kaj mi esperis paroladi kun li, sed li ne respondis al mia amika saluto. Tiam mi proponis partopreni kun li mian panon kaj kokinaĵon, kaj tiujn ĉi li akceptis sed sen ia dankesprimio. Tio ne min mirigis, ĉar la anoj de nia urbo estas tre malmulte dankemaj, sed ŝajnis pli mirinde ke li ne volas trinki eĉ iom da vino, ĉar niaj urbanoj tre volonte trinkas, eĉ drinkas vinon kaj likvorojn.

Baldaŭ li foriris, kaj mia amiko rakontis lian historion. Ŝajnas ke la ermito loĝas ĉiam sur la marbordo, kaj neniam iras al la urbo aŭ al la

butikoj kaj ne, eĉ dum la Kristnaska festo aŭskultas la mezon en la nemalproksima preĝejo. Li dormas sub la ŝtonegoj aŭ en ia ĝardeno. Li interparolas kun neniu kaj ne havas amikojn. Tamen li estas edzigitita pli ol unufoje, kaj havas multajn idojn, sed li ilin forlasis, kaj ili nature ne amas lin, kaj kvankan kelkaj parencoj loĝas apude ili ne vizitas lin. Li neniam iris al la komunuma lernejo kaj ne povas legi aŭ skribi. Li ne tranĉas la hararojn kaj havas longajn vangharojn, kaj estas sen botoj, sen ĉemizo kaj sen ĉapelo.

Mia amiko ne povis doni al mi aliajn sciigojn, kaj li mem ne scias kie la ermito naskiĝis aŭ kiam li komencis tiun ĉi manieron da vivado.

Mi demandis kiel li nutras sin, ĉar li ne laboras kaj neniam aĉetas. Ĉu li posedas bienojn aŭ monon? Ĉu li sendas iun en la urbon? Ne, li respondis, sed li rabas en la ĝardenoj sed preskaŭ ĉiutage li manĝas fiŝon, ĉar kiam la fiŝkaptantoj altiras marbordon siajn retojn li subite ekkuras al ili, kaj ili aŭ donacas iom, aŭ foririnte lasas la senvalorajn restaĵojn por li, kaj kelkafoje ili kiuj amas la solulon, donas siajn manĝaĵetojn, pecon de pano aŭ makaronio aŭ fromaĝo. Tial la mizerulo ne estas tute legommanĝantulo nek tute viandmanĝantulo.

De tia tago mi rakontis la aferon multfoje al miaj amikoj. Ĉiuj diras, "Tre strange, mi ankaŭ iros serĉi lin." Jes, estas strange, ne vere en tiuj ĉi nuntempoj, en kiuj turistoj, ne dezertuloj, troviĝas en la Egiptaj dezertoj, kaj la grotoj de la antikvaj ermitoj estas nur vizitataj de kampofestenantoj. Tamen ne tre strange, ĉar mia nova amiko estas nur kato, pli ruza ol siaj samspeculoj, ĉar li povas manĝi fiŝon ĉiutage sen ia timo pro malpacoj kaj unĝrataĵoj.

C. BICKNELL.

## LA ORA KORO.

Fantazio, originale verkita de C. Oxenford.

Unu vidvino kuŝis sur sia lito. Si estas mortonta. Ŝi scias ke baldaŭ ŝi devas lasi sian filineton sola en la kruela mondo; kaj tiu penso doloras ŝin pli multe ol ŝia malsanego. Ŝi alvokis sian filineton, kaj ŝin karesante, diris: "Karulino mia, mi foriras al malproksima lando, kaj vi ne min revidos ĝis multaj jaroj. Ne, plej amata, ne ploru; certe, vi min revidos ian alian tagon. Aŭskultu, kiam mi iros, vi estos sola; sole vi devos pasi tra la vivado. Mi estas tiel malriĉa ke mi ne havas ion ajn vin doni; sed ĉirkaŭ via kolo vi havas ĉeneton portante la duonon de ora koro, kiun vi portis de la tago kiam vi naskiĝis. Ie en la mondo vivas knabo kiu posedas la alian duonon de tiu ĉi koro, kvankam mi ne scias kie, ian tagon vi lin renkontos, kaj tiam, kiam vi renkontos unu la alian, vi trovos, ke la duonkoroj kuniĝos, kaj neniŭ nek nenio ilin povos rediŝiri, aŭ rompiĝi. Sed, estu singardema; multe da viroj provos preni de vi la duonkoreton, aŭ deziros ĝin interŝanĝi, aŭ ĝin aĉeti. Plie, eble vi mem trompiĝos, kaj kiam vi vidos duonkoron similan al la via, vi pensos ke ĝi estas tiu kiun vi serĉas. Eble ĝi estos tiel simila ke ĝi trompigos ambaŭ vi kaj la havanto. Sed estos pruvo. Se ili ne egalas, ili ne kuniĝos, kiel ajn vi penados, kaj neniam vi povos forpreni ĝin de la ĉeneto. Bone do rigardu, kaj zorgu, ke vi ne montros vian oran koron tuj kiam vi pensas ke vi vidas unu ŝajne simila al ĝi. Reaŭskultu: estas belega lando kiun mi treege deziras ke vi trafu. Ĉiu penas trafi, sed ne ĉiu sukcesas. Neniam alvenas tien iu kiu estas sola. Estas nur duope ke oni povas atingi la Paradizon de la Koroj. Tial, karulino, ĝis la tempo kiam vi trovos la knabon kiu havas la alian parton de via koro, ne penu iri tiun landon. Tio estas ĉio, kion mi povas diri, mi laciĝas. Adiaŭ, plej karega filineto mia, mi ne pli longe povas gardi aŭ zorgi pri vi,—min kisu—mi iras—," tiam, per lasta peno, ŝi aldonis tiujn ĉi vortojn: "Ne permesu aliu ajn vidi vian koron—ĝis vi—renkontos—la alian, tiam vi—konos. Adiaŭ, kar—"

La knabineto ploris multe, sed kvankam la najbaroj ŝin kompatis, ili ne povis redoni al ŝi ŝian patrinon. Baldaŭ ili ekmalzorgas ŝin; eĉ ili ekmalametas ŝin, ĉar ŝi ne estas simila al la aliaj knabinoj. Ŝi ne estas bela, kvankam ŝi havas bonkoron; sed ŝi havas tre mallumajn okulojn, kiuj ŝajne travidas la personon al kiu ŝi parolas, kaj neniŭ amas tion, ne vere? Unu virino diris al ŝi "Vi havas kruelajn okulojn, mi volas ke vi ne rigardu tiele ĉe mi." Tiu ĉi virino estis trompantino.

Tamen la knaboj ludus kun ŝi antaŭ ol ili ludus kun la aliaj knabinoj; kaj kiam ŝi iĝis pli granda, pli maljuna, ili marŝas kaj paroladus kun ŝi anstataŭ kun la pli belaj junulinoj en la vilaĝo. Tial ŝi malamiĝis de multaj, kaj ŝi estas tre malfeliĉa. Ŝi estis tute sola, kaj ŝi multfoje ploris por ŝia perdita patrino. Sed, neniam ŝi montras al iu sian malgrandan duonkoron, kvankam ŝi elrigardus malrankvile por vidi ĉu iu ajn el la junuloj havas duonkoron simila al la ŝia. Sed ne, tre malofte knabo montras ĉu li havas koron aŭ ne, kaj inter la malmultaj kiujn ŝi vidis, neniam estis unu kiu estis eĉ iomete simila al la ŝia.

Sed, unu tago alvenas al la vilaĝo juna viro, kiu estas tri aŭ kvar jaroj pli maljuna ol ŝi. Ho, li estas bela, forta, kaj tiel agrabla kaj aminda, ke ŝi pensas: jen estas eble la junulo kiu havas la alian duonon de mia koro. "Mi estas certa, ke se mia patrino estus ĉi tie, ŝi same dirus," diris ŝi al si mem. En tiu ĉi tempo ŝi estas malamegita de ĉiuj ĉirkaŭ ŝi, ĉar kiam ŝi viriniĝis, ŝi trovis ke ĉio en la vilaĝo estas malsimila de tio kio ĝi aperas esti. Ĉiu portas maskon; kaj ŝi neniel komprenas kial. Tial ŝi ofte fortiras la maskojn de iaj personoj, ĵus kiam ili la plej dezirus ĝin konservi. Tial, vi vidas, ŝi devas esti treege malamata. Ĉie ŝi portas ĉagrenon, hontecon, kaj certe, en la okuloj kaj laŭ la pensoj de tiuj ĉirkaŭe ŝi estas malbonkora.

La junulo kiu estis nove alveninta, vidas tiun ĉi, kaj kompatas ŝin. Ili iĝas geomikoj, kaj ŝi tute konfidas al li. Tagon ŝi montris al li sian oran koron, kiun, kiam li vidis, li deziregis havi, kvankam li bone scias ke li ne havas la alian duonon. Sed li havas la duonon de kupra koro, kiun li pensas igi similan al la ŝia. Li observis zorge la supraĵon de ŝia koro, kaj poste tordis, fleksis, kaj poluris sian kupraĵon, ĝis ĝi vere ekaperas iomete simila al ŝia, tiam li montras ĝin al ŝi, kaj ŝi, ĉar ŝi estas ankoraŭ juna kaj malsaĝa, kaj ĉar ŝi pensas ke ŝi lin amas, ekdonas la sian; sed subite ŝi vidas ke eĉ dum ŝi rigardas, la kupraĵon iĝas malhela, malluma, kaj kiam ŝi volus provi ĉu la du kuniĝos, ŝi trovas ke ŝi neniel povas sian forpreni de la ĉeno ĉirkaŭ sia kolo. Kiam la junulo trovis ke li ne povis gajni ŝian koron, li pli kaj pli ĝin deziris. Li iĝis tre kolera, kaj preskaŭ tiel kruela kiel la vilaĝanoj, kaj iaforte penis perforte ŝteli la malgrandan duonkoron, sed ŝi tiel forte ĝin tenis, ke li ne povis.

Fine, ne povante trovi aŭ feliĉecon aŭ bonkorecon en sia vilaĝo, ŝi foriris de sia naskloko, kaj marŝis dum la nokto ĝis la proksima urbo; esperante

ke tie ŝi povos labori por sia pano, dum ŝi serĉas la junulon kiu posedas la alian duonon de sia koro, kiun ŝi trovas ĉiutage pli peza. Certe, pensis ŝi, tie ĉi baldaŭ mi trovos mian korkunulon, ĉar la jena devas esti la plej granda urbo en la mondo, kiel ĝi estas la plej bela. Eble mi estas proksime la Paradizon de la Koroj, kiun mia patrino priparolis.

Ho ve! Baldaŭ ŝi trovas ke la urbo estas nek bela nek granda, kaj la koroj de la loĝantoj, se iam ŝi vidis iajn, estas maldolĉigitaj, malbeligitaj. Ŝi devigas labori treege, sed neniam ŝi povis plaĉigi siajn mastrinojn, kaj ofte ŝi multe ploras dum ŝi laboregas. Semajnojn, monatojn, eĉ jarojn ŝi pasigas tiamaniere, sed ĝis nun ŝi ne estas trovinta iun kiu posedas la alian duonkoron. Unu tagon ŝi renkontis maljunegulon, kiu diris al ŝi ke neniam ŝi trovos tion, kion ŝi serĉas en tiu urbo. Li loĝis tie dum multe da jaroj, kaj li bone scias ke preskaŭ ĉiuj la loĝantoj jam kunligis siajn korojn, kvankam multaj pretendas ke ne, kaj multaj aliaj pretendas ke siaj kunulinoj estas nesimpatiaj. Ne, ŝi alvenis ĉe la malprava urbo, ŝi devis sin turni maldekstre, anstataŭ dekstre, kiam ŝi foriris de ŝia vilaĝo.

"Ho ve!" diris ŝi, "mi estas tiel lacigita vivi tiel izole malĝoje. Ĉu mi akceptos unu el la kupraj aŭ ŝtaloj koroj kiujn oni prezentas al mi? Ili tre brilas, kaj unu aŭ du preskaŭ egalas al la mia. Kompreneble ili neniam kunigos, sed—ĉu jes, ĉu ne?" Ŝi pripensadis mallonge. "Ne, mi ne povas, estas neutile peni. Mi ne estas ankoraŭ tro maljuna por penadi trafi tiun landon kiu estas tiel bela. Eble mi povos trovi ĝin sole, malgraŭ la timoj de mia patrino. Eble ŝi eraris, en ŝia zorgeco pri mi. Jes, mi iros, eble estas alia vojo el tiu ĉi urbo, kiu kondukos min al la Paradizo."

Tial ŝi demandis de ĉiuj kiujn ŝi renkontis, ĉu oni povus montri al ŝi la vojon al la Paradizo de la Koroj. Sed ĉiuj ridis.

"Vi! Penas trovi tiun landon kiun trovas ja malmultaj. Ho jes, estas vojo el tiu ĉi urbo kondukante al ĝi, sed estas malofte uzita, kaj estas tre malfacile vidi la vojeton nune. Ankaŭ vi estas tro maljuna, tro malbela—malsaĝa. Estas nur la junaj belulinoj kiuj sukcesas, ĉar ili ĉiam estas helpataj. Vi neniam ĝin trovos sole. Vidu," diris unu, "trarigardu tra tiu ĉi okulvitro, estas maldolĉa, malbela, malluma vojo, kaj la Paradizo estas trompaĵo, estas pli malbona ol tiu ĉi urbo."

Sed alia viro kompatis ŝin, kaj diris: "Malfeliĉulino, bone pensu. Se vi ekiras, vi ne povos reveni. Vi devas iri longe antaŭ eĉ vi alproksimiĝas je ĝi. Unue vi devas trairi tra la *Aleo de la Nekomatoj*, ĉe la fino de la aleo, vi trovos la *Simpativojn*; ĉe la krucojoj, maldekstre, vi vidos la *Strateton de la Amantoj*; kiam vi alvenos al la fino de tiu strateto, vi eniros la grandegan *Arbaron*

*de Ellern-unu-la-alian*, kaj trapasinte tra tiu malfacila arbarvojo, vi trafos la belan landon kiun vi serĉas. Sed kie estas via kunulo? Ĉu vi ne havas iun? Nur duope oni povas tiun landon trafi."

"Ho ve! tiel diris mia patrino, sed mi pensis ke eble ŝi eraris. Ŝajnas al mi ke estas tre longa malfacila vojaĝo, kaj mi ne ankoraŭ trovis iun kiu sufiĉe min amas por eĉ montri al mi la vojon. Kial mi ne penas iri sole?"

"Ho, multaj estas pensintaj ke ili povus trafi la landon sole, sed neniam mi aŭdis ke ili sukcesis. La vojo estas vere malĝoja kaj doloriga al tiuj kiuj penas."

"Mi ne estas timulino. Eble mi trovos iun jam sur la vojo. Kie do estas la unua strato, la *Aleo de Nekomatoj*, ĉu vi bonvolos diri al mi?"

Li ridetis.

"Vi estas nune preskaŭ ĉe la fino de la Aleo; tie estas la komenco de la *Simpatia Vojo*. Nu, mi admiras vian kuraĝon, mi iros kun vi ĉe la fino de la Aleo, kaj montras al vi kie estas la krucojoj."

Ĉe tiu ĉi eldiro, ŝi tre kontentiĝis. Jam ŝi malametis la penson de devigi diri adiaŭ al la bonkora viro. Pensis ŝi, li estas la unua persono kiun mi renkontis en la urbo, kiu ŝajnas havi koron.

Nu, ili marŝis kaj marŝadis, kaj nekonscie marŝis tra la *Simpativojo*; sed noktigante, ili restis ĉe *Amikdomo* ĝis la sekvanta mateno, ĉar li trovis ke li ne povus re trafi la urbon antaŭ la nokto falus. Kiam mateniĝis, ŝi malgaje ekdiras adiaŭ, sed li respondis: "Estas tiel bela mateno, mi iros pluete kun vi, kaj almenaŭ montras al vi kie la *Am-Strateto* eliras el tiu ĉi vojo, kaj tiam ni diros adiaŭ." Ili do marŝadis malrapide sur la vojo, paroladante dume. Ju pli ili parolas, des pli ili ametas unu la alian kaj ree nekonscie ili atingas la krucovojojn kaj sin turnas en la strateton.

"Ho, kia bela strateto," kriis ŝi.

"Jes, estas vere bela," li respondis, sed nek li nek ŝi scias ke ili estas jam en *Am-Strateto*, kaj tiel ili marŝadas kune. Dume ili promenadas, li rakontas al ŝi ĉion pri li mem, kaj ŝi rakontas al li ĉion pri ŝi; sed neniam vorton pri la ora koreto. Subite, li diris:

"Mi plenkonfidis al vi (ĉar mi vin tre ametas, kaj mi bone scias ke vi estas konfidinda) tion kion mi neniam antaŭe konfidis al iu." Tiel dirante, li elprenis el sia brustpoŝo, skatoleton, kaj ĝin malfermante, montras al ŝi la duonon de malgranda ora koro. "Tiu ĉi," li diris, "estas la sola aĵo kiun mi posedas, sed mi vidas ke vi estas ankoraŭ pli malriĉa, kaj devas iri longe antaŭ vi trafos vian deziratan landon. Ĉu vi akceptos ĝin? Estas difekta, mi scias, kaj ne multe valoras. Mi ne scias kie estas la alia duono, sed tia kia ĝi estas, mi volonte donas ĝin al vi, ĉar mi vin amas."

Kiam ŝi ekvidis la koron, kaj aŭdis liajn vortojn,

preskaŭ ŝi svenis pro ĝojo, sed ankoraŭ ŝi timas. Supozu ke lia koro ne egalas la ŝian—supozu ke ĝi ne estas ora, sed nur kupra; ŝi pensis. Sed nune ŝi ekvidas la arbojn de la grandega arbaro en la blua malproksimaĵo, kaj ŝi treege ektimas, kaj inklinas reiri al la urbo.

“Ĉu vi ne akceptos mian oferon? KREDU ke ĝi estas vere oro; mi scias ke ĝi ne estas grava, kara donaco, sed estas mia ĉio.”

Tiam ŝi parolis—kun rideto sur ŝiaj lipoj, sed larmetoj en ŝiaj okuloj. “Ĉu vi ja donos al mi vian duonkoron, vian ĉion? Sed, rigardu, amiko mia, mi ankaŭ havas duonkoron. Mia patrino diris ke ie estas viro kiu havas la alian duonon, ni vidu, eble niaj duonoj kunligos kaj iĝos unu tuta koro. Kun tremantaj manoj, ili pruvis la rompitaĵajn duonojn. Jes, ili iĝis unu; kaj ili do interŝanĝis ilin; li portis la ŝian, kaj ŝi portis lian, ĉar ili trovis ke kiam ili remetus ilin en iliaj propraj ingoj, ili ne povis.

Nu, post tio, ili pensis ke ili devas zorgi trovi la *Strateton de la Amantoj* antaŭ falos la nokto, sed—! Jen rigardu! Longtempe ili estas marŝadinta sur ĝi kaj ne sciis.

“Nun mi ne povas forlasi vin,” li diris, “mi ankaŭ iros kun vi, kaj kune ni trovos tiun belan landon, la *Paradizon de la Koroj*. Kune ni iros tra

la arbaro, sed ĉar estas malluma arbaro, ni do haltos hodiaŭ ĉe la domo de *Hymeno*, la forĝisto, kaj li forĝos ĉenon kiu kunligos niajn duonkorojn, tiel keniam ni povos iri malproksime unu de la alia. Ni restos nokte ĉe *Mielluna Dometo*, kaj morgaŭe ni kune iros tra la *Arbaro de Ellern-unu-la-alian*.

Tiun ĉi ili faris.

Ho, sed estis grandega, malluma, malfacilirebla arbaro. Estis multaj malboneprituloj tie, kiuj provis ŝteli iliajn korojn. Multaj estis la malfacilaĵojn kiujn ili trovis; malhelpaĵojn kiujn ili devigis surrampi. Multefoje ili ekfaletas. Multefoje ili preskaŭ rompigis siajn korojn, sed la ĉeno de *Hymeno* estas forta, kaj ilin kuntenas. Unufoje, ĉio mallumiĝis kaj malgajigis; venis teruran ventegon, sed subite, kiam ĉio aperis senespera, infaneto venis al ili el la mallumo, kaj ludis ĉirkaŭ ili; alligante floriajn ĉenojn al la hymena ĉeno. Tiam ree la suno ekbrilas tra la densaj arboj, kaj baldaŭ ili vidas ke ili preskaŭ estas ĉe la fino de la arbarvojo. Ili iĝas gajaj kaj ludas kun la infaneto; ili pendigis la duonkorojn ĉirkaŭ ĝia kolo, kie tuj ili kunigis kaj estas unu koro. Ili nune estas trapasintaj tra la arbaro, kaj estas trafintaj la alian flankon kaj en unu momento, subite ili vidas la gloran sunon kaj la belegan kamparon de la *Eterna Korparadizo*.

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

“La Amerika sencereemonieco.” Tiu estas preskaŭ la lasto frazo de la antaŭa (Maja) Fragmento; sed ankoraŭ pripensante la aferon mi komencas dubi ĉu, eĉ en tiu granda sencereemonieco, oni ne trovos ankaŭ ceremoniecon. Pri tio la leganto juĝu: mi rakontos al li kiel eble plej akurate tion kio okazis.

Mi legis libron en unu el la salonoj kiam alvenis vizitantoj; almenaŭ mi unue pensis ke ni vidos nur kelkajn vizitantojn. Baldaŭ mi trovis ke estas vere vizitantarego, ĉar kiam ĉiu seĝo havis sidantilon, kaj tie ĉi kaj tie staris grupetoj da homoj, ni estis vidintaj, por tiel diri, nur la unuajn gutojn de la hompluvado. La pluvo rapide fariĝis pluvego, kaj la pluvego daŭradis ĝis superakvego.

Ĉu mi daŭrigos la komparaĵon, kaj priskribos kiamaniere, ekkaptita de tiu homa turnakvo, mi

estis forĵetata en angulon de la ĉambro, kaj tie restis tiel kiel se mi estus marportita lignaĵo enfendaĵo de ŝtonego; kaj kiamaniere fine tiu homakvego superakvegis sur la balkonon kaj en la ĝardenojn?

Ne; mi diris ke mi rakontos la aferon “kiel eble plej akurate,” kaj tia priskribo donus ideon-pri tumulto, kvankam en tiu amindega kaj bonkora kunveno tumulto certe ne estis. Tamen la gastarotute plenigis la ambaŭ salonojn kaj troviĝis ĉie en la du ĝardenoj.

Se seĝoj mankas, tiel ke oni povas sidigi nur malgrandan porcion da la gastaro, pro kio tio valoras? Oni ricevas gastojn per koroj, ne per seĝoj, kaj la pastraj koroj (tiel kiel ankaŭ la pastra gastemeco) estas senlimaj.

Bedaŭrinde la du salonoj ne posedis la saman-

karakterizon, kaj, tiamaniere plenigitaj, oni povas bone imagi ke ili baldaŭ fariĝos ne nur varmaj sed varmegaj. Mi vidis ĉirkaŭ mi aregon de brilantaj okuloj; mi vidis pafarkajn ridetantajn lipojn; mi aŭdis gajajn kaj dolĉajn voĉojn ondetantajn tiel kiel arĝentaj sonoriloj, kaj—ĉe la unua okazo mi ekfugis en la ĝardenon al la egale feliĉa sed multe malpli varma ekstera gastaro.

Tie mi trovis kelkajn kiuj grave diskutis pri diversaj aferoj, sed la pli juna kaj pli saĝa porcio de la gastoj amuzis sin per la ludoj de *Croquet* kaj *Snake* (kiun lastan ludon mi jam priskribis en la kvara (Aprila) Fragmento). Tro ofte ni pliaĝuloj vivas inter la nuboj de venonta pluva tago, kiu eble por ni tute ne venos. La infanoj, multe pli saĝaj, ĉiam ekkaptas *la nun*. Ili obeas al la vortoj de proverbo kiun kredeble ili neniam aŭdis:—

La Tempon perditan, pasintan,

Revenigi vi tute ne povas;

La Tempo estonta ne estas;

Ekkaptu *Vi*,—kion vi trovas.

Kunvenojn tiajn kiajn mi priskribas la Amerikoj nomas *Surprise Parties* (kunvenojn de surprizo); kaj oni aranĝas ilin laŭ la sekvanta maniero:—

Kiam oni decidas fari al iu la honoron de unu *Surprise Party*, oni interkonsentas ke, ĉe fiksita horo de fiksita tago lin vizitos ĉiuj la interkonsentantoj.

Nature la familio vizitota tute nescias pri la afero (alie la kunveno ne estus unu de surprizo), sed kredeble tiu familio estas la sola en la vilaĝo kiu ne konas la ĉiujn aranĝojn.

Mi kredas ke ofte oni kunportas manĝaĵojn kaj lasas la vizititojn pli bone provizitajn ol ili estis antaŭ la kunveno; tiamaniere el la kutimo farante delikatan metodon por helpi kaj samtempe honori la malriĉulojn. Sed pri tio mi ne povas diri de mia persona sciado. Certe ĉe tiu ĉi okazo, oni tion ne faris, sed, malgraŭ la ligna dometo, la pastro ne estis malriĉulo.

Tre ofte vizitis la pastrejon sinjorino kiu estis antaŭ ne longe edzigitaj, kaj kies idolo estis ŝia *Baby* (infaneto). La etulo portis oran broĉon, oran ĉenon kun pendaĵo, kaj sur la fingro ĝi havis oran ringon.

Memorante la antikvan infanejan ritmon mi rigardis la piedojn por vidi se ĝi havis ankaŭ "sonorilojn sur la piedfingroj," sed kredeble tiu ĉi ideo ne ankoraŭ eniris la patrinan kapon, kaj mi ne kuraĝis ĝin inspiri. La kompatinduleto jam portis sufiĉon kaj mi neniel deziris pligrandigi tiun *pezon* de amo.

Vere Amerikaj infanoj estas treege frumaturaj. Ni ĉiuj konas la rakonteton pri infanistino kiu eniris la salonon kie sidis Amerikino kun sia kvar aŭ kvin jara infanineto.

"Ĉu vi sonorigis, sinjorino?" demandis la infanistino.

"Ne," ekkriis la knabineto. "Mi sonorigis. Forprenu la panjon, mi petas. Ŝi estas treege maldolĉa kaj malagrabra."

Sed malgraŭ lia frumatureco, mi ŝatas la Amerikan infanon. Li ne estas sen ĉarmo, kaj li estas almenaŭ sincera kaj tre patriota. Mi ne memoras kie mi legis la sekvantan sed ĝi tre montras tiun ĉi karakterizon.

Instruisto demandis de sia klaso:—"Kiu estis la unua homo?" Kaj malgranda knabeto tuj respondis "George Washington." Nature la instruisto estis mirigita.

"Ĉu vi neniam aŭdis pri Adamo?"

"Ho! jes," respondis la eta patrujamulo, neniel hontigita, "sed mi ne pensis ke vi ankaŭ kalkulas fremdulojn."

Oni povis kompreni la sentojn de la Amerika sinjorino, kiam Italianino demandis al ŝi:—"Ĉu Ameriko estas tiel granda kiel la urbo Firenze (Florence)?"

Jen kion diris al mi juna Amerikano:—"Kial vi ne parolas al mi, sinjoro? Mi vin bone konas. Ĉu vi ne memoras? Mi estis hieraŭ sur balancilo en la ĝardeno, kaj kiam vi preterpasis, preskaŭ mi frapis vian kapon."

Iom stranga pretendo al konateco, sed ankoraŭ pli stranga estis tiu de malgranda samlandano.

Mi vidis la malgrandan knabeton sidanta sur malgranda triciklo kaj min rigardanta per grandaj bluaj okuloj. Tiel atente li min rigardegis ke la triciklo tute renversigis kaj falis sur la korpeton de la malgranda rajdinto. Mi rektigis la ambaŭ, rajdinton kaj rajdinton; kaj ankoraŭ sidigis lin sur la selon. Tiam, per reproĉinda voĉo, li diris: "Ĉu vi ne konas min, sinjoro?"

Vane mi penis revenigi en memoron la malgrandan ĉagrenitan vizaĝon.

"Ne," mi fine respondis. "Mi ne memoras vin. Ĉu mi vin antaŭe vidis?"

"Ho, jes; antaŭ unu jaro kiam mi estis tre, tre malgranda. Ho! for, for de tie ĉi. Ĉe G— Ĉu vi ne memoras? Mi konis vin tuj."

"Ne, knabeto. Antaŭ unu jaro vere mi estis ĉe G— sed mi vin ne memoras."

"Sed, sed,— vi parolis al mi. Vi puŝis Biciklon supre sur la kolino; mi estis sur la vojo, kaj vi parolis al mi."

"Ne, mi ne memoras. Kion al vi mi diris?"

Vi diris, vi diris: "For de mia vojo, knabeto, aŭ mi vin surkuros." Sed vi ne parolis maldolĉe kaj vi ridetis. Ho! mi konis *vin* tuj, kaj mi pensis ke vi ankaŭ konis *min*." Kaj la larmegoj formigis en la grandaj bluaj okuloj.

Sed tro longe mi postsekvis la memorojn pri infanoj. En la proksima fragmento mi revenos al mia priskribo.

## MIKSAĴO.

Inter multenombraj leteroj, gazetoj kaj diversaj avizoj kiujn sendis afablaj amikoj dum nia alilanda forestado, ni trovis la sekvantajn novajn librojn:—

*La Norda Stelo*, belforma skribmaŝinata gazeto, organo de la Aberdeen Esperantist Club. Ni deziras sendi korajn gratulojn pro ĝia eldonmaniero kaj enhavo.

*Esperanto*, scienca kaj literatura monata revuo, redaktata de Marich Agostin (8 pp.), en la lingvoj Hungara & Esperanta. Eldonejo Papnovelde u. 6. Budapest IV., Hungary.

Programo de Esperanta koncerto, kiu okazis en Vladivostock la 2 an Marton, 1905.

*Union Internationale*, Aprilo, 1905, enhavanta longan kaj valoran artikolon pro-Esperantan de Joseph Jamin, Direktoro de la Belga Sonorilo.

*Do you know Esperanto?* utiliga broŝuro de la London Esperanto Club, enhavanta gramatikon, kritikojn de eminentuloj pri Esperanto, kaj la leterojn por enskribigi sur la Adresaro.

*La langue internationale, peut-elle être le latin?* (eltirita el *L'Esperantiste*) de Marquis Louis de Beaufront. En la lingvoj Franca kaj Esperanta (77 paĝoj), 60 c.

*L'Esperanto, langue internationale auxiliaire*, par Edgar Sacré. Artikolo kun ilustraĵoj kaj du geografiaj kartoj verkitaj laŭ la Tutmonda Jarlibro de 1904. Eldonata, 23A, Avenue Longchamps, Uccle, Bruxelles, Belgium.

*Esperanta Svensk Ordbok* (Esperata-Sveda vortaro), de P. Ahlberg, granda 145 paĝa bonege presita verko, kosto f.2.50, de 50, Döbelnsgatan, Stockholm, Sweden.

*La tekniko de la termala kuracado ĉe Aix-les-bains*, de D<sup>ro</sup> Jean Dardel, eldonata ĉe la Esperanta medicina biblioteko, 25, Rue de l'École de Medicine, Paris. 23 pp.

*La langue internationale auxiliaire*, congrés de Grenoble, 1904. Séances générales, eldonata ĉe la grupo Esperantista Pariza, 28, Rue Serpente, Paris. 28 pp., kosto 50 c.

*La kolorigisto aer-veturanto*, tradukita de la Grupo de Monaco. Ĉe Hachette, 24 pp.

Ankaŭ en Parizo ni vidis la novan Rusan monatan gazeton, *Esperanto*, kaj korege ĝojas pro ĝia beleco. Ĝi ja ŝajnas esti inter la manoj de tre fortaj kaj energiaj kundukantoj.

Estas atentinde ke nuntempe preskaŭ ĉiuj Esperantaj gazetoj pliboniĝis rilate ekstera vidaĵo. Antaŭe oni ricevis ilin legis ilin, kaj kaŝis ilin, por ke amikoj ne vidu tiajn malbonajn revuojn. Kontraŭe, ni nun fiere kuŝigas la Esperantajn ĵurnalojn sur niajn skrib-tablojn kaj aliloke, por ke ili, pro siaj

belaj eksterajoj, altiru la atenton de la ekrigardanto. Tiu ĉi estas vera signo de progreso.

Inter la diversaj avizoj, kiujn enhavis la restaĵo de la korespondado, estas nur eble citi malmultajn.

Nia agema Dovera Grupo perdis la servojn de ĝia antaŭa tre energia Sekretario, S<sup>ro</sup> Geddes, sed ni devas gratuli la grupon trovinte novan Sekretarion en S<sup>ro</sup> Chitty, kies fervoreco estas sufiĉe bone-konata. Sir William Crundall, la eminenta Urbestro de la havena-urbo, konsentis fariĝi la grupan Prezidanton—honoron pro kiu ni kore dankas lin.

La Dovera Komerca Ĉambro donacis £2 2s. al la Bulonja Kongreso.

Du filinoj de nia nelacigebla Maitre Michaux edziniĝos ĉe la suprenomita Kongreso. Ambaŭ la edzoj estos Oficiroj de la Franca armeo, kaj ankaŭ Esperantistoj. La atestantoj estos D<sup>ro</sup> Zamenhof mem, kaj tri aliaj Esperantistoj el Canada, Peru kaj Hispanujo. Oni diras ke la sub-urbestro ĉe Esperantiĝas, por povi fari Esperantan paroladon ĉe la ceremonio! Bonege!

Pri la Kongreso mem estas plezure ekvidi ke ĝi promesas esti eĉ pli signifa ol ni atendis. Jam kelkaj aŭtoritatuloj certigas ke pli ol tri mil Esperantistoj ĉeestos. Certe ni ĉiuj plezure atendas la 5<sup>an</sup> de Aŭgusto por renkonti tiujn amikojn, kies nomoj jam estas ĉiuj-tagaj vortoj ĉe ni, kaj kies agoj kuraĝigas nin je la ĉiama propaganda laborado.

S<sup>ro</sup> René Deshays, la fama verkisto de la bela kanto *La Vojo*, verkis, por la Kunveno, novan himnon al D<sup>ro</sup> Zamenhof.

La Grupo de Liège, Belgujo, deziras ke ni petu tiujn Esperantistojn, kiuj vizitos la Lieĝan ekzpozicion, ke ili ankaŭ venu al la Grupaj kunvenoj, kiuj okazas ĉiuj lundoj kaj vendredoj (je la oka horo vespere), en la kafejo "Au petit Trianon," Bvd. de la Sauvenière, apud la Reĝa Teatro.

S<sup>ro</sup> Boirac, Rektoro de la Dijona Universitato, deziras altiri la atenton de la tutmonda Esperantistaro al la libertempa kurso ĉe tiu Universitato kiu daŭros de 1 Julio ĝis 31 Oktobro. S<sup>ro</sup> Lambert jam tre sukcese faris Esperantajn kursojn kaj intencas samon fari tiun ĉi jaron. Li plezure sendos pliajn informojn, se oni petos ilin de la Universitato de Dijon.

S<sup>ro</sup> Michaux sendis al ni la sekvantan sciigon pri la Universala Kongreso:—

*Grava Alvoko.*—La unua Kongreso estonte, laŭ la parolo de D<sup>ro</sup> Zamenhof, la paĝo la plej serioza de la Esperanta historio, estas necese ke ĉiu Esperantisto respondu jese al nia alvoko. Tiu ĉi elmonro devas fari grandan impreson tra la tuta



mondo, ĝi devos gajni la indferentulojn kaj plie venki la malamikojn. Estas pro tiu celo ke D<sup>ro</sup> Zamenhof prezidos la unuan kongreson kaj volas ke ĉiu ĉeestanto subskribu kun li la netuŝeblajn kaj fundamentajn regulojn de la lingvo.—Do, ĉiu vera Esperantisto devas veni al la Kongreso, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. Li tiel tre helpas la definitivan triumfon de nia kara afero.

*Kunvenoj.*—La Kongreso komencos la 5<sup>an</sup> de Aŭgusto kaj daŭros unu semajnon. La Komitato speciale insistas por ke ĉiuj kongresanoj ĉeestu almenaŭ je la 6<sup>a</sup>, 7<sup>a</sup>, kaj 8<sup>a</sup> de Aŭgusto. Tiuj ĉi tri tagoj estas rezervataj por la plej gravaj kunvenoj.—La 10<sup>an</sup>, okazos ĝenerala mara promenado, dum kiu oni vizitos Esperantistajn havenojn, Anglajn kaj Francajn.—La sekvantajn tagojn, variaj distraĵoj.—Ĉiuj kiuj povos, aŭ kanti, aŭ deklami, bonvolu tion sciigi al ni. Ni

P.S.—*Ni petas ke niaj kunverkantoj bonvolos sendi kelkajn artikolojn kiel eble plej baldaŭ. Dum nia vojaĝo la enhavo de la tirkesto ne bone kreskis!*

plie organizos vesperkunvenon kun naciaj vestaĵoj.—Ni tre insistas por ke ĉiu kongresano kiu akceptas tion, skribu tuj al ni.

*Ekspozicio.*—Granda Ekspozicio estos organizata. Ĉiuj grupoj Esperantistaj estas petataj sendi kiel eble plej multajn dokumentojn al S<sup>ro</sup> Deligny, sekretario de la grupo de Saint-Omer (France).

*Aliĝoj.*—Ĉiu Esperantisto kiu sendos almenaŭ 5 frankojn ricevos (krom la karton kiu permesos ĉeesti ĉe ĉiuj kunvenoj aŭ festoj de la Kongreso kaj ricevi rabaton da 50 po 100 sur la fervojoj) detalajn programojn kaj ilustritan gvidlibron de Boulogne, kaj de la Kongreso.

Senutile estas diri ke la kartaj prezoj ne sufiĉos por egaligi la elspezojn. Ni do danke akceptos la monoferojn kiujn oni bonvolos al ni sendi.

Por ĉiuj sciigoj, sin turni al: "S<sup>ro</sup> Michaux, advokato—Boulogne-sur-Mer (France)."

## DONI AŬ NE DONI!

E.W.

Ĉirkaŭ la jaro 1847 multe da laboristoj ne plu dungigis en la regaj fabrikejoj ĉe Deptford. Tiame oni ne kutimigis aŭdi pri du milionoj da malsataj estaĵoj en sia lando, kaj terura estis la ideo ke 2,000 homoj mizerigis senkulpe. Estis ankaŭ terure vidi arojn da viroj lacaĵ kaj hontemaj, kiuj marŝis malrapide kaj silente, rigardante surtere.

Ili ne povis trovi laboron, kaj ne volis almozuligi; apenaŭ mano ŝanceliĝe etendiĝis por ricevi modeste prezentitan donacon.

La unuan fojon ke mi renkontis aron da tiuj ĉi malfeliĉuloj mi ne havis monon sur mi, sed preskaŭ senvole mi donis mian mufon kaj rapide ekdemetis miajn felajn kolumnojn kaj manumojn, dirante: "Mi petas, pronu tion ĉi kaj ĝin vendu."

Unu viro repuŝis mian manon, kaj dua diris: "Ke Dio benu vian korpon kaj animon, vi bonkora idiotulino! Ĉu vi ne povas vidi ke tio ne donos al ni unu duonon da plumbuŝo da pano, kaj vi estus malvarma la tutan vintron?"

Estis vere, ĉar ili estis inter 400 kaj 500 viroj.

De tiu tempo mi ĉiam portis mian monujon kiam mi promenis, ĝis fine mi ne havis plu moneron, krom ŝilingo, kiun mi gardis por aĉeti poŝtmarkojn.

En tre malgranda strateto mi renkontis subite unu el la malriĉeguloj nun ja almozulo. Li ŝajnis tiel sovaĝa, tiel malespera, ke mi preskaŭ timis lin preterpasi, sed, kiam mi diris: "Mi bedaŭras, mi ne havas monon," li nur ĝemis kaj mi lin lasis. Post kelkaj paŝoj mi memoris la ŝilingon, kaj mi

sciis ke mi trompis lin. Kompreneble mi kuris kaj, lin atinginte, diris "Nesciante, mi mensogis al vi, mi forgesis tiun ĉi ŝilingon. Prenu ĝin."

Li unue min rigardegis, tiam li ekkriis "Ho vi bona kara estaĵino, diru al mi vian nomon kaj adreson. Mi repagos ĝin al vi."

"Ne," mi diris. "Donu ŝilingon kiam vi havos monon, al iu via kunulo kiu ĝin bezonas."

"Fraŭlino, neniam mi ne faris tion, diru al mi tamen vian nomon, por ke mi juru je ĝi!"

Mi petis lin neniam blasfemi, sed mi diris al li mian nomon kaj, kun manpremo, ni disigis.

Unu el miaj amikoj, pastro kiu pli frue estis advokato, alvenis al mi kaj sin turnis por akompani min. Mi kredas ke, vidante la manpremon, li pensis ke mi monon donacis, ĉar li ekkomencis longan predikon pri la malbonmoreco de nediskreta almozdono. Li min sciigis ke oni multege oferdonis pro la 2,000 senlaboruloj, ke komitato el viroj saĝaj kaj sindonemaj informigis pri ĉies karaktero, tial ke nur merituloj ricevu helpon.

Mi lin demandis ĉu li konsilis al la malmerituloj ŝteli, sin mortigi, aŭ morti pro malsato, sed li ne bonvolis respondi al rimarko tiel nerespekto-plena.

Li anstataŭe sciigis min ke mi devos aĉeti biletojn por doni al la almozuloj, tiel certigante, ke mia mono elspeziĝos en pano, kaj ne en biero kaj alkoholo.

Enfine li min preskaŭ konvinkis ke mi grave

pekis, kaj dum du tagoj mi pentis pro mia memindulgo. Mi ne aĉetis biletojn, ĉar ĝis la venonta monato mi ne havus monon.

La kvaran tagon mi vekigis feliĉa, ĉar mi pensis: "Ne estas certe ke mi helpis al friponoj kaj ankaŭ la plej malvirtulojn iafaje plibonigis bonaĵo.

Post iom da tempo oni aŭdis malbonajn raportojn pri la mirinde organizita help-komitato. Centoj da homoj devis ĉiutage stari multajn horojn sur la stratoj por atendi sian vicon por enskribi siajn nomojn kaj adresojn. Neniu el ili ricevis nutraĵon, sed, la morgaŭan tagon ili devis denove atendi (ofte dum sep horoj) sur la stratoj por ricevi pan-biletojn kiujn ili devis porti al bakistoj por havi panon por du tagoj. De tagmezo ĝis la tria aŭ kvara horo de mateno la stratoj, en kiuj loĝis tiuj

bakistoj amasiĝis de viroj kaj kelkaj virinoj kies edzoj ne plu povis marŝi. La plej fortaj baraktis al la butikoj kaj frue ricevis panon, la plej malfortaj nenion ricevis, kaj ofte tiujn ĉi svenis kaj estis forportataj hejmen de la policanoj. Policanoj ankaŭ devis aresti pli ol 200 da ebruloj kiuj, ricevinte panon, ĝin forportis al la drinkejo por ĝin ŝanĝi kontraŭ alkoholo.

Kiam mi eltrovis ke tiuj ĉi famoj ne estis neigblaj, mi pensis: "Pli bone estis agi memstare ol konfidi en komitato el viroj tiel saĝaj kaj sindonemaj!"

Eble mi eraris, sed estas malnova proverbo: *Kion vi atendas de porko, se ne blekon*, kio signifas: *Kion vi atendas de tre maljuna virino se ne sentimantan malsaĝecon*.

## MEMOROJ PRI IRLANDO.

Originale verkita de Florence A. Meigh.

Kvankam oni ofte aŭdas malafablajn rimarkojn pri Irlando kaj la tieaj malriĉaj loĝantoj, ĝi estas sendube tre interesa lando kie paŝigi la somerajn libertempojn. Aparte de la belegaj pejzaĝoj kaj interesaj antikvaj konstruaĵoj, oni allogiĝas per la kuriozaj kutimoj, spirito kaj boneco de la vilaĝanoj. Eble multe da la eraraj ideoj pri ili deveniĝis de la pentraĵoj kiujn oni kelkafoje vidas, kiuj imago ilustras "Irlandan Vivon." Tiuj ĉi ofte estas tiel ridindaj, kiel ili estas malkorektaj; kaj se oni demandus de malklera Angla laboristo "Kiel vivadas la Irlandano?" Eble li dirus "Li estas viro kiu manĝas nur terpomojn kaj loĝas ĉe malgranda malpura dometo, kune kun siaj porkoj, kortbirdoj kaj azeno." Certe mi ofte estas vidinta la kortbirdojn en la kuirejo, sed nur unufoje mi estas vidinta la porkon dormanta paceme sur la pordŝtupo kun la nudpiedaj geknaboj ludantaj apude. La malaltaj dometoj kun blankigitaj muroj kaj dikaj pajlaj tegmentoj estas tre pentrindaj; sed malfeliĉe la luantoj ne ĉiam sin ĝenas pri la eksteraj riparoj ĉar mi rimarkis kelkafoje, ke kiam la kamentubo rompiĝis, oni ĝin anstataŭis per ligna barelo sen aŭ supro aŭ malsupro.

La kredemo pri la agoj de la protektanta sanktulo "Patrick" estas tre kurioza. Estas bonekonata fakto ke estas nek serpentetoj nek bufoj en Irlando; kaj kiam mi foje demandis *Kial?* Viro diris al mi ke "La benita Sanktulo Patrick ilin forpelis maren antaŭ multe de centjaroj" kaj li montris al mi pentraĵon kiu atestis almenaŭ al sia kontentigo la verecon de sia raporto. Sed estas kurioza fakto ke, kvankam mi estas preninta tie kelkajn bufojn, ili ĉiam mortas post mallonga

tempo; tiel oni devas konjekti ke la malbeno de la sanktulo ankoraŭ restas sur la bufa raso! Kompreneble ĉe la kamparaj kvartaloj oni malofte renkontas aŭtomobilojn kaj sekve la azeno (kiu estas la precipa ŝarĝbesto de la malriĉuloj) prenas tiun ĉi okazon certigi sian obstinegan naturon. Mi neniam forgesos rajdinte trans marĉego kune kun amiko sur memmova biciklo. Ni estis sur longa rekta vojo, kie azeno estis vaginta. Aŭdante la bruon de la biciklo li staris por ĉirkaŭrigardi, sed laŭta blovego de la korno funkciis magie kaj li forkuris antaŭ ni blekante timeme. Je ĉia posta blovego la ĉaso pli rapidiĝis, ĝis ni preskaŭ flugis. Estis neeble preterpasi lin ĉar li kuris de flanko ĝis flanko de la vojo; kvankam post unu mejlo la vojo bonsance forkigiĝis kaj nia amiko rapide diris adiaŭ.

La malgrandaj kamparaj kvartaloj ne ĉiuj posedas preĝejojn kaj la adorantoj devas ofte veturi kelkajn mejlojn dimanĉe. Mi estas vidinta ok aŭ naŭ azenojn (kun ŝarĝoveturiloj) alligitaj al muro apud la preĝejo, atendante dum la okupintoj sin konfesas. Sed la veturilaj sidejoj estis tre ridindaj. Oni vere diras ke "*Neceseco estas la patrino de elpenso*" kaj ĉar la ŝarĝoveturiloj ne ĉiuj posedis sidejojn oni estis uzinta ordinarajn kiurejajn seĝojn; sed historio ne rakontas kio okazus se la veturisto erare veturis en la defaŭlilon.

Estas malmulte da almozuloj en Irlando sed ilia metodo demandi almozojn estas tre amuziga. Okazis foje ke mi sidigis ripozi voj-flanke, kiam almozulino alproksimiĝis. Ŝi demandis monon per hipokrita, malforta voĉo kaj diris ke se mi donus

al ŝi: "La anĝeloj rekompence faros mian liton ĉiele." Sed kiam mi rifuzis, ĉar ŝi estis sufiĉe forta por labori, ŝi formarsiĝis kaj rapide esprimis la deziron ke: "La diablo venos kaj enmetos aron de urtikoj en la liton." Ordinare la donaco de sespencoj elvokas sufiĉajn benadojn por plenigi malgrandan libron.

Oni rakontas ŝercan rakonton pri la longeco de la Irlando mejlo kiu estas 1,440 futoj pli longe ol la Angla mejlo. Foje viro kiu vojaĝis ĉe County Antrim (kie oni nune kalkulas Angle) demandis de policano "Kiom da mejloj malproksime estas

B—?" La policano respondis "Nu! estas nur 12 mejloj se vi marŝas sur la maldekstra flanko de la vojo, sed, se vi marŝas sur la dekstra flanko estas 15½ mejloj." Li poste klarigis ke oni ne estis forpreninta la malnovajn Irlandajn mejlstangojn kiam oni enmetis la Anglajn sur la kontraŭa flanko de la vojo. Ankaŭ mi ofte estas rimarkinta ke kiam vilaĝano diras ke estas "nur unu mejlo kaj peco al X—," la peco estas multe pli longa ol la mejlo!!

Sed tio ĉi estas nur bagatelo kaj oni multe lernas per sperto.

## FREMDULO EN FREMDALANDO.

De C. W. T. Reeve.

(Muziko jam verkita presigos kiam sufiĉe da mendoj ricevigis de S<sup>ro</sup> Reeve).

Vojaĝinte tra la mondo, Mi alvenis al Londono;  
Aŭdis fremdan babilaĵon, Mi ne sciis eĉ la sencan.  
Sed sufiĉe, pantomime, Mi divenis facilege.

Tie fraŭlo renkontante, Fianĉinon kaj vidante  
Ke la bopatrin' estonta, Estas eble ne venonta,  
Li gojiĝas, ŝin salutas. Ĝoj'-esprimojn li elŝutas:

*Aj se Gud De! Haŭ du ju du? Baj Ĵov ju du  
luk fajn!*

*Pre tek e sil, maj ledi fer, Jur lajk e roz divajn.  
Naiŭ tek e kek bisajd jur plet. Ajl por aŭt jur ti.  
Ju ĉarm mi, dir, Ho du ste hir. Haŭ kud ju se  
Gud Baj?*

Alveninte al Hindujo: Ŝajnis al mi Varmegujo!  
Sed agrabla estas ŝanĝo, En la land' kaj dum  
vojaĝo.

Ve, mi estis malkontenta, Ke la besto homman-  
ganta

Ne troviĝas sur la strato: Nur en kaĝo je la ĉirko.  
Iris mi Kortegon Rajan, Kaj la festsaluton lernis,  
Kiun aminduma Hindo, Diras al kort' danculino:

*Ram ram o meri pijari, Tu bare naĉti haj;  
Aŭr tere hi ĥub gane se, Muŝe kuŝ ata haj.  
Asman se aji ho? Bolo! Aŭr devi pajdi ho  
Ja dunja ki ho? Ganne do, To mera aram ho.*

*Traduko:* Saluto ho mia karulino, Vi bone dan-  
cadas

Via bonega al mi kantado, Plezuron tre  
donas

Ĉu vi estas de cielo? diru! Diino nas-  
kiĝis

Aŭ al mond' apertenas? Sciigu! Tiam  
mi gojiĝos.

(Horo de S<sup>ro</sup> PARSONS).

Post alveno en Francujo, Mi rapidis al Parizo,  
Granda bruo tie regis, Kaj pro tio mi tre miris  
Parizanoj gajaj estas, Sinjorinoj min tre ĉarmas.

Veturiloj grandanombre, Forkuradas tre rapide,  
Tuj mi vokas kondukiston, Mi veturas la bul-  
vardon  
Kondukisto al mi krias, Ĉar kvin frankojn nur mi  
donas:

*Alor vun done pad purbuar. Ah, vre! vu net pa  
riŝ;*

*L' koŝen travaj pa pur la gluar, Il nem pa lez hom  
ŝiŝ.*

*La proŝen fua, si vu vule, j' ve vu prete ma burs  
E kom sa alor vu pure Akitel prid la kurs!*

(S<sup>ro</sup> LEGOFFRE, du Havre).

Pri belega Italujo Poste mia kor' sopiris,  
Fama land' de muzikistoj, De postoj, de pentristoj  
Kaj Napoli min altiris, Kies anoj tre feliĉaj  
Estas se makaronion Ili povas ĉiam manĝi.  
Tie brunan boatiston Mi renkontis, kaj subite  
Li ekkantis la kanteton, Karan al Napola koro

*Amata Celestina, vjen! al mare a peskar;  
La luna alta e in ĉjel; perke in tera star?  
La barka mia vita e; la rete e amor,  
Affida ti a me, e vjen, e da il tuo kor.*

(CLARENCE BICKNELL, Bordighera).

Tiam havis mi plezuron Formigradi Hispanujon,  
Kie polvo, bruo, suno, Hejto, ŝvito ŝajnas puno;  
Kaj malbonaj registaroj Estas oftaj kiel gitaroj.  
Sed mi tie gaj' vivadis, Trihkis, dancis kaj kantadis  
Kun gojegaj gejunuloj. Kaj ni ŝajnis frenezuloj  
Kiam bovojn salutante, Ni foriris ekkantante:

*Vivan toros i toreros, Sol i alegrta!  
Ole por las morenttas D' esta kompanja!  
Abanikos i mantiljas, Flores en la peĉo,—  
Mi pobre korason está Roto i desĉeo!*

(NORMAN MACLEAN, Aguilas).

## LA ORA HORO (ELFED).

Tradukita el la Kimra Esperanten de Pastro T. Eli Evans.

|  |   |
|--|---|
| Ar ganol dyddiau trymaidd Daw ambell awr, mor euraidd !  | Meze de malĝoja tago Jen venas la ora horo !  |
| Nid hafddydd goreu'r ddaear All fagu awr mor hawddgar.   | La plej bela somer-tago Ne povas doni tian horon !  |
| Daw'n wyn o dragwyddolfyd, Gan hedfan drwy ein hadfyd.   | Ĝi venas blank' el l'eterno Kaj flugas tra mizero nia   |
| Bu'r gwilithsydd ar ei haden, Un waith ar winwydd Eden.  | La roso sur ĝia flugilo Ja venis el Paradizo  |
| Dros Fryn y Cariad hedodd, Ar fraich y Groes disgyhodd   | Super la montet' da Amo Kaj ripozis sur la Kruco.   |
| Cyffyrddodd gwaed a'i gwenfron A daeth yn nes at ddynion.  | Ĝian bruston sango tuŝis, Ĉe la homaro ĝi venis.  |
| Ar ganol dyddiau trymaidd Mae'n d'od—yr awr nefolaidd.   | Meze de malĝoja tago Venas—la ĉiela horo.   |
| Dio ofte punas sekretajn pekojn per publika honto. Ĉio en Dio estas mirinda, kaj Dio estas mirinda en ĉio. | Meriti honoron sen ricevi ĝin estas pli bone ol ricevi honoron sen meriti ĝin.  |
| La Sanktulo preferas havi Dion sen ĉielo, ol Ĉielon sen Dio.   | La vero ne estas en tiu, kiu ne estas en la vero. Li, kiu ne prenos ekzemplon de aliaj, estos farata ekzemplon por aliaj. |
| Kelkaj trompas siajn korojn, kaj, ĉe aliaj, la koroj trompas ilin mem.                                     | Peko estas en ĉiu sankta homo, sed ĉiu sankta homo ne estas en peko.  |

KRESPO<sup>1</sup> PUNTA.

(Recepto eltirita el "Annales Politiques et Litteraires").

Tradukita A. Vuillaume (Stenay).

*Materialo.*

Tri ovoj.  
 Sama pezo da sukero.  
 " " da tritika faruno.  
 " " da freŝa butero.  
 Da lakto sufiĉa kvanto.

*Metodo.*

Miksu la sukeron kune kun la faruno, rompu la ovojn, agitu la tuton aldonante la varmetigitan buteron. Varmetigu lakton, kaj ĝin versu iom post iom, evitante sekajn amasetojn. Parfumu per vanilo aŭ rumo. Hejtu paton, ŝmiru ĝin sorĝe kaj tenu ĝin iom klina, prenu unu kuleron

da pasto, lasu ĝin flui en la paton donante al la kulero alternan movon, por ke la pasto sternigu unuforme kaj maldike. Tuj kiam la krespo estas orkolorigita, elprenu ĝin per tranĉilo, volvu ĝin ĉirkaŭ la tranĉila ŝtala plato kaj metu sur pladon.

Tiuj krespoj, nomataj ankaŭ volvitaj krespoj, estas tre bonaj kiam ili estas varmaj, sed ne malpli bonaj kiam ili estas malvarmaj. Oni povas ilin konservi almenaŭ dum ok tagoj, se oni zorgas enmeti ilin en ladan keston.

<sup>1</sup> Krespo (*France, crêpe; Angle, Pancake*) speco de kukaĵo, kiun oni manĝas ordinare dum la Grasa Mardo, t. e., la tago kiu finigas la karnavalon.

## SAGA HUNDO!

Viro, kiu zorgis grandan hundon por amiko kiu vojaĝis eksterlande, malplaĉigis ĉar la besto ĉiam sidis en la plej bona seĝego.

Unu tagon aĉeo frapis lin. Li eniris la ĉambron kaj trovis la hundon en lia kutima loko, tial li marŝis fenestron kaj kriis "Katoj! Katoj!"

La hundo supersaltis kaj kuris al la fenestro, dum la viro sidis seĝegon.

Post kelkaj tagoj la hundo eniris la ĉambron kaj trovis ke lia mastro sidis seĝegon.

Irinte al la fenestro li bojis laŭte.

La viro leviĝis por vidi tion kio okazas kaj la hundo saltis en la seĝegon.

F. E. BEARNE

(8225).

## LA SINAPSEMERO.

El "La Lumo de Azio" de Sir Edwin Arnold.

Versigita de A. Motteau.

. . . Kaj kiam ili trafis riverbordon,  
 Klinante sin, per manlevad' salutis  
 Virino juna, dolĉokula; pløre  
 Ŝi diris al la Majstro :—Ĉefsinjoro,  
 En figarbejo loĝas mi, kaj nutris  
 Fileton mian; lude, tra florejo  
 Kuranta li eltrovis serpenteton;  
 Ĉi-tiu ĉirkaŭ lia manradiko  
 Sin volvis, dum la knabo ride tuŝis  
 La buŝon kaj forklangon de l' rampaĵo.  
 Sed baldaŭ li paliĝis kaj subite  
 Ne movis. Mi la kaŭzon nek komprenis,  
 Nek kial liaj lipoj lasis mamon.

—“Li veneniĝis!” al mi diris iu;  
 Alia eĉ aldonis: “Tuj li mortos.”

La karan idon mi ne volas perdi;  
 Mi petis do el ili kuracilon  
 Por lumredoni al okuloj liaj;  
 Ĉar estas tre malgranda la kismarko,  
 Kaj serpenteto povus nek malami,  
 Nek suferigi mian etan filon!

Sed, iu diris: “Estas jen sanktulo;  
 Sur la monteton nun li ĵus alvenis.  
 Demandu al la flavrobvesta viro  
 Ĉu kuracil' ekzistas por malsano  
 De via filo.” Tial mi tremanta  
 Tuj venis al vi, diefrunta Majstro,  
 Kaj pløre maltegmenta la vizagon  
 De l' kara infaneto, mi vin petis  
 Sciigi al mi ĉu ekzistas herboj  
 Por resanigi lin. Vi, Ĉefsinjoro,  
 Ne min forpuŝis; dolĉe vi rigardis  
 Kaj ame palpis la idetajn vangojn;  
 Sed lin vi revualis kaj tuj diris:  
 “Jes, fratineto, estas io tatiĝa  
 Por resanigi vin kaj vian idon,  
 Se baldaŭ ĝin vi povos al mi doni.  
 Mi petas, trovu da sinapo nigra  
 Nur eron, sed ne ĝin akceptu  
 El domo kie patro aŭ patrino,  
 Infano aŭ servisto iam mortis.  
 Bonege estos se tielan grenon  
 Vi povos trovi.”

Tiel vi parolis,  
 Ho, Ĉefsinjoro!

Diris nun la Majstro  
 Kompate: “Jes, precize miajn vortojn

Vi ĵus ripetis, ho, Kisagotami!  
 Sed, ĉu vi trovis la sinapsemeron?”

Mi iris, Majstro, kun l'infan' malvarma,  
 Al brusto lin premante, mi petegis  
 En ĉiun homloĝejon, tra la junglo,  
 Kaj tra la urbo:—“Al mi ĉu bonvole  
 Vi donos eron da sinapo nigra?”  
 Kaj kiu tion havis al mi donis,  
 (Ĉar helpas malriĉulojn malriĉuloj).  
 Sed kiam mi demandis ĉu en domo  
 De tiaj geamikoj iu mortis,  
 Aŭ patro aŭ patrino, infan', servisto?  
 Tuj ili diris:—“Ho, fratino kara!  
 Demando via tute stranga ŝajnas:  
 Mortintoj tre superas la vivantoj!”

Dolore do mi tuj redonis eron,  
 Por aliloken iri. Sed mi aŭdis:  
 “Jen estas grajno, sed ni perdis sklavon;  
 Jen estas ero, sed la mastro mortis;  
 Jen estas semo, sed semisto mortis  
 Dum l' intertemp' de pluvoj al rikolto!”

Nenian domon trovis mi grenhavan  
 En kiu, Majstro, jam neniu mortis.

La senridetan idon malvarmegan  
 Sub river-vinberlatbo mi kuŝigis,  
 Por veni ree al vi piedkisi,  
 Kaj peti por *sinapa sem' sen morto*.  
 Sed mi tre timas ke l' infano mia  
 Hierat' mortis, kiel iu diris.

Fratino mia, diris nun la Majstro,  
 Vi trovis, dum vi serĉis neeblojon,  
 Balzamon laŭtan, kaj gravegan scion.  
 Mortinta jam sur via brust' hierat'  
 Ripozis via ido. Karulino,  
 Vi scias nun ke la homar' tutmonda  
 Kortuŝe vian perdon vere ploras:  
 Dolor' de ĉiuj malgrandigu via!  
 Ho ve! volonte mi la sangon mian  
 Elverŝus por haltigi viajn larmojn,  
 Se povus tio de l' malbeno homa  
 La kaŭzon trovi. Kial amo sankta  
 Farigas agonio? Kial milionojn  
 Da homoj, tra la floroj, oni trenas  
 Al oferado sanga, kiel brutojn?

La knabon enterigu—dum mi serĉas.

LA FRATOJ DE BIRCHINGTON'.  
(Legendo de la Insulo de Thanet, Angllando).  
Originale verkita de Sydney H. Emptage.

De la enŝipigejo de nia urbo, Margate, rigardante al la Okcidento, oni povas vidi, malproksime de proksimume naŭ mejloj, du altajn turojn de tute similaj vidigoj, kiuj elstaras kontraŭ la horizonto sur la ekstrema rando de la krutaĵo. Tiuj turoj—kiujn oni nomas "Reculvers'"—estas la restaĵo de antikva monaĥa preĝejo, konstruita antaŭ multe da centjaroj, kaj jam utiligita dum la regado de nia Henriko IIa. (jarojn 1135—1154).

Nu, oni diras, ke la turoj ne estis parto de la originala preĝejo. Oni rakontos al vi du diversajn legendojn, laŭ la gusto de la rakontanto—unue, ke ili estis aldonitaj de abatino, kiel dankpago ĉar ŝi savigis el terurega ŝippereo—due, ke konstruis ilin la "Fratoj de Birchington'," ankaŭ kiel dankpago. Jen sube la dua legendo, laŭ niaj lokaj saĝuloj.

Kiam regadis nia Henriko IIa., en Reculvers vilaĝo staris sentura monaĥejo, en kiu loĝadis kiel ĉefabato certa Rikardo de Birchington', saĝa, bona, religia homo, kiu preĝis, fastis kaj pentofaris senĉese; li estis mondfama pro sia sankteco. Vere feliĉa homo—laŭ sia idealo—oni pensus, kvankam li ne dormadis sur lito de rozoj; sed neniu povas ĝui perfektan feliĉecon, kaj li havis sian dornan kronon. Ĝi estis efektive lia frato Roberto, ankaŭ "de Birchington'." Tiu ĉi kavaliro tute similis al Rikardo—ekstere, tio estas, kaj nur ekstere, ĉar li ne estis sanktulo—kaj el tiu simileco kreskis ĉiuj specoj da malplaĉaĵoj. Roberto mokis sian fraton; drinkis, blasfemis, eĉ mortigis kaj ĉiam serĉadis okazon por ĉagreni lin. Malbonaj viroj, kiuj malamis la ĉefabaton, aŭdinte pri certaj pekoj de Roberto, ofte diris kun palpebrumo—"Ho jes! ni bone scias, sed . . . ĉu li ne estis Rikardo?" Tiaj kalumnioj treege vundis la bonulon, sed li paciencie suferis kaj nenion diris.

Nu, la Princo de la Mallumo ekzamenis sian nigran libregon, en kiu li konservas registron de la pekemaj homoj, kaj ekvidante sub la flamskribita nomo de "R— de Birchington'" grandegan nombron da pekoj, li alvokis diableton kaj ordonis al li:—

"Supreniru teren kaj alportu tien ĉi la viron, kies nomo aperas sur tiu ĉi surskribeto. Mi trovas, ke lia ŝuldo tro pligrandiĝas, kaj li devos elpagi ĝin tiun tagon mem. Foriru!"

La morgaŭan tagon, la monaĥoj serĉadis ilian ĉefon, kiu estis malaperinta.

Kie li estis? Nek en kelo, nek en preĝejo; li tute neniigis. Maltrankvile ili atendis lian revenon ĝis la tagmezo, kiam palvizaĝa vilaĝano rapide

enkuris por sciigi ke li ĵus trovis la ĉefabaton en la kamparo mortinta.

Sekvis kriado, plorego, malĝojo; preĝas la monaĥaro, terurplena: sonadas la mortsonoriloj, kaj la vilaĝo, kies anoj tre amis la mortinton, alprenis funebran vidigon, silente bedaŭrante ĝian perdon.

Subite, en la mortĉambron, aperis la Sanktulo Thomas à Beckett. Kvazaŭ per magio la bruego ĉesis, la sonorilado silentiĝis.

La Sanktulo benis la kunvenon, ĉirkaŭrigardis kaj diris:

"Kion vi havas, miaj filoj? Pro kio vi ploregas?"

Ili unuvoĉe respondis "La ĉefabato."

Sankt' Thomas' alproksimiĝis la mortulon, ekridetis, poste sulkigis, kaj fine rimarkis:

"Ha! mi tiel pensis. La Diablo havas lin."

Je tiuj vortoj, teruro revenis al la aŭdintoj, kiuj tuj rekomencis murmuri preĝojn, sed la Sanktulo trankviligis ilin, elstreĉante la brakon kaj dirante:—

"Ne timu, miaj filoj. Satano estas vere multe-pova, sed li ne povas venki min, kiu estas ankoraŭ pli multepova. Mi devigos lin revivigi mian fraton, Rikardon."

Li forte frapigis kontraŭ la ŝtonoj sian episkopan bastonon. La tero ekskuis kaj malfermis. Sur kolono da fajro elsaltis Satano, grincante la dentojn kaj tremante pro kolero; sub brako li portis la nigran libregon. La monaĥoj ankaŭ ektermis—ne pro kolero—ĉar la Diablo ŝajnis minaci ilin; sed Sankt' Thomas' eĉ ne paliĝis.

"Bone, perfidulo!" li kriegis, "ĉu vi jam alvenas? Kion vi faras, serpento? Vi kredis ke vi povos ŝteli la puran animon de estonta Sanktulo, ne vere? Nu, vi multe eraris. Reportu ĝin sen ŝanceliĝo, kaj remetitu ĝin en la korpon de tiu mortulo. Ne rifuzu! ĉar mi avertas vin . . . nu, la Infero sendube havas ĝiajn turmentojn, sed je tia okazo mi elpensos por vi iaĵn ĝis nun nesonĝblajn."

Satano altigis la ŝultrojn, kaj malbenis sian malbonsancon, sed li tamen respondis kun respekto.

"Pardonu min, Sankta Moŝto, mi petegas, ĉar tio ne estis mia kulpo. Vi baldaŭte vidos ke mi havis rajton. Rigardu en mian libregon jen aperas la nomo—"R— de Birchington', kavaliro, loĝanto en Reculvers." Nu, li estis Rikardo—aŭ R— de Birchington', li loĝadis ĉe Reculvers; ke li estis pastro anstataŭ kavaliro ne estas mia eraro, sed de mia sekretario, kiu malbone enskribis lian profesion.

Pura animo?" kaj li ridegis. "Ekzamenu, mi petas, la kolekton da pekoj."

Sankt' Thomas' sulkigis kiel fulmotondro. Per sia bastono, li batadis la Diablon, samtempe kriante:—

"Tio ĉi eble farigos vin pli zorgema. Vi eraris, idioto. Ĉu vi ne sciis ke Rikardo havis fraton, Roberton? Ŝtelu lin, se vi volos; li estas malbonulo kiel vi—sed, vi tuj reportos la animon de tiu sankta homo. Nun, rapidu! . . . rapidu!"

Pro manko da spirado, li ĉesis, kaj Apoljono, kiu vane penis eviti la fortajn batojn, murmuris kvazaŭ li ploris pro kolero kaj honto:—

"Bone, Via Sankteco . . . sed mi jam nuligis la ŝuldon kaj . . ."

"Rapidu!" interrompis S. Thomas'. "Aŭ mi batos vin denove."

Apenaŭ li finigis la paroladon, kiam la mortulo ternis, ocedis kaj malfermis la okulojn. La monaĥoj ĝoje alproksimiĝis al li, gratulis pro lia mirinda reveno al la tera vivado, kaj poste fervore dankegis Sankt' Thomas'on. Dum ili ĉiuj interparoladis tiamaniere, eniris la ĉambro Roberto, kiu alvenis por demandi pri sia frato. Li ekdiris:—

"Ho! graseguloj! Ĉu vi ion aŭdis pri . . ." kaj tuj neniĝis. La Infera Reĝo, sidiganta en angulo, elpuŝis raŭkan, mokeman ridon, tordante sin de ĝojo, ĉar li tre ŝatis la konsternemajn vizaĝojn, kiuj ĉiuparte ĉirkaŭturnis, kvazaŭ por eltrovi la kaŭzon de tia dua malapero.

Sed lia plezuro daŭris nur mallongan tempon. Sankt' Thomas' hokis lin per la kolo, kaj piedfrapis lin per fortaj batoj.

"Kiel? Ankorau?" li demandis. "Ĉu vi jam

forĝesis tion, kion mi promesis al vi? Kien vi alsendis Roberton? Al la Infero, sendube. Nu, revenigu lin, kaj baldaŭe, aŭ . . ."

"Ne, Sankta Moŝto," plendis la Mallumreĝo. "Rigardu en mian libregon pro kiom da pekoj li ŝuldas min . . ."

"Li ŝuldas al vi tute nenion ajn," respondis S. Thomas'. "Ĉar vi mem certigis ke la ŝuldo estas jam nuligita. Ne penu trompi min, perfidulo! Memorigu mian averton, kaj montru al ni Roberton."

Post tiu parolado, okazis tondra bruego, kun flama ekbrilo, kaj oni ne vidis plu la Diablon. Apenaŭ li foriris, kiam la tero denove malfermis, kaj la korpo de malfeliĉa Roberto, elĵetinta el la truo ĝis la plafono, falis pezeme sur la ŝtonplatojn.

De tiu tago, la karaktero de Roberto ŝanĝis. Li forlasis sian pekeman vivadon, konfesis sin kaj longe pentofaris, kiam post senpekiĝo li eniris la monaĥejon, en kiu, la legendo juras, neniam antaŭe nek poste, loĝadis monaĥo tiel pia kaj tiel bonfarema. Siajn posedaĵojn li ĉiujn vendis, disdonante la plimulton da mono al la malriĉuloj de tiu kvartalo. La restaĵojn li aldonis al simila sumo provizita de Rikardo, kaj iom pli malfrue la monaĥa preĝejo posedis du altajn kvadratajn turojn, kiujn la vilaĝanoj nomis "La Dunaskitojn."

Je tiuj ĉi tagoj nur restas fragmentoj de la muroj de la preĝejo mem, sed dum kaj tra la pasintaj centjaroj fortike elstaradis la frataj turoj, kaj—al ĉiuj kiuj kredas, aŭ konas la legendon—sendube memorigas tiun mortigitan Sanktulon "Thomas à Beckett," kiu savis el la teruroj de la Infero, la animojn de la "Fratoj de Birchington'."

## LA PATRUJO DE LA ROZESENCO.

Ilarion Raytcheff (Burgas).

En la naturo ekzistas unu fortaodoro al la homo kontentiga, ĝojiga. Mi preparolas la roz-esencon, kies patrujo estas la Bulgaraj roz-valoj.

La parfumistoj scias ke du-trionoj da la rozesencon en la tuta mondo eliras el Bulgarujo, ĝi estas pura, natura kaj forta.

Dum la jaro 1903 Bulgarujo sendis kilogramojn da rozesencon kiel sekvas: Al Anglujo 1,054, Aŭstrujo 64, Belgujo 4, Germanujo 1,027, Italujo 36, Rusujo 272, Unuigitaj Ŝtatoj 1,467, Turkujo 393, Francujo 1,870, kaj alien 22.

Do 6,210 kilogramoj entute estis forsenditaj.

Tiu ĉi cirkonstanco min devigas rekomendi tiun ĉi komercaĵon de nia patrujo.

Eksterlandaj fabrikistoj aĉetas ĝin por fari diversajn parfumojn.

Rozesencon oni enmetas en ujojn da diversaj mezuroj, kaj vendas ĝin proksimume je unu franko po gramo. Se oni volas aĉeti iom da la esenco, oni skribu tien ĉi pri la dezirata kvanto, sendante poŝtan mandaton aŭ poŝt markojn laŭ la dirita-kosto. Oni plezure plenumos mendojn de dek gramoj ĝis cent kilogramoj.

*Aviso de la Redaktoro.*—Mi ricevis de S<sup>ro</sup> Raytcheff, kiu estas la Limpajej-estro ĉe Burgas, specimenon de tiu ĉi roz-esenco, kaj tute senŝancele mi konsilas ke parfumamantoj mendu kelkajn gramojn da la bonodora komercaĵo kaj tiel ne nur profitu pro Esperanto, ricevante la veran parfumon, sed ankaŭ tiel montru al niaj Bulgaraj amikoj ke Esperanto plifaciligas komercajn interrilatojn.

H.B.M.

## MIA LIBERTEMPO.

La Redaktoro.

En kupeon, se plaĉos !

Kaj, post la multenombraj trompet-blovoj, fajfoj kaj ekkrioj kiuj akompanas la forveturon de Franca vagonaro, mi ektraveturis tiun parton de Esperantujo kiu kuŝas inter Parizo kaj Marseille.

Jam frumatene mi renkontis niajn bonajn amikojn S<sup>ro</sup> Ducros (patro kaj filo) kaj Legoffre en Havro, kaj poste, en tiu malgranda oficejo kiu baldaŭ plilarĝigos, mi havis la plezuron paroladi por la unua fojo kun Hungaroj. Efektive la Akcia Societo, kies estroj estas D<sup>ro</sup> Fruictier kaj S<sup>ro</sup> Lengyel Pal estas ja internacia oficejo. S<sup>ro</sup> Lengyel kaj lia helpanto nur parolas Esperante kaj Hungare, S<sup>ro</sup> Mann estas Anglo, kaj D<sup>ro</sup> Fruictier kompreneble estas Franco. Oni do aŭdas nur Esperanton, dum oni aranĝas la tip-literojn por niaj progresemaj samtempaĵoj, la *Lingvo Internacia* kaj la *Internacia Scienca Revuo*.

Nu, revenante al la skuiga vagonaro, ni estas kvazaŭ en Anglujo, ĉar ĉiuj kupeanoj estas Angloj.

Pri la mirinda vojaĝo sur la Mediteranea maro ne estas mia nuna intenco verki. Estas tute neeble vorte pritrakti tiun temon. Mi nur skribu ke, post trankvilega vojaĝo, simila al la naĝado de cigno sur spegula lageto, ni trovas nin ĉe Palma, ĉefurbo de la Hispana insulo Majorca. Mi kredas, ke tie ne ankoraŭ troviĝas Esperantistoj. Pro tio mi devis akompani la aliajn ŝipanojn kaj atendi ĝis la morgaŭ antaŭ ekgui la specialan privilegion de la Esperantisto.

Sed vere, kiam miaj estimataj amikoj Sinjorino kaj Kapitano Cape-Montrosier kaj ankaŭ S<sup>ro</sup> Bresson renkontis min en Alĝero, kaj kondukis min ĉiam kaj ĉie, la kunvojaĝantoj ja volus ĝui la saman afablan kondukadon !

Efektive, se mi ne estus havinta tiajn gegvidantojn, mi estus timinta eniri la misteran antikvan urbon, kie troviĝas la ĉarmego de la loko. Sed, post interesega promenado kun Sinjorino Cape, kaj post neforgesinda matenmango ĉe Araba restoracio, mi sentis min tute sentima en la novaj ĉirkaŭaĵoj.

Tiu transiro de Eŭropo en Afrikon ja postulas tutan volumon da priskribo.

Mi povus doni la menuon de tiu impresiga festo, mi eĉ povus desegni la grandan lignan kuleron, kiu estis nia sola ilo por mango, sed esprimi la senton esti en tia miksaĵo da nigruloj kaj diversaj vestoj, mi tute ne povas.

*En voiture, s'il vous plait !*

And, after the innumerable trumpet squeaks, whistles and cries which accompany the departure of a French railway train, I commenced to traverse that section of Esperantoland which lies between Paris and Marseilles.

Already, early, I had met our good friends Messrs. Ducros (father and son) and Legoffre in Havre, and later on, in that little office about to be enlarged, had had the pleasure of speaking for the first time with Magyars. In fact, the Limited Company, of which Dr. Fruictier and Mr. Paul Lengyel are the mainstays, is indeed an international office. Mr. Lengyel and his assistant speak only Esperanto and Magyar, Mr. Mann is an Englishman, and Dr. Fruictier is, of course, a Frenchman. One therefore only hears the Esperanto tongue, while the type is set for our progressive contemporaries, the *Lingvo Internacia* and *Internacia Scienca Revuo*.

Well, returning to the joggley railway train, we are as it were once again in England, for all the travellers are English.

Of the wonderful voyage in the Mediterranean it is not my present intention to write. It is quite impossible to treat of such a subject verbally. Let me but say that, after a most tranquil journey, resembling the passage of a swan over a mirror-like lake, we find ourselves at Palma, the capital of the Spanish island of Majorca. I believe no Esperantists are yet to be found there. On this account I had to accompany my fellow travellers and wait till the morrow before commencing to enjoy the special privilege of the Esperantist.

But, indeed, when my esteemed friends Mme. and Captain Cape-Montrosier and M. Bresson met me in Algiers and conducted me everywhere and always, my fellow travellers would indeed have liked to enjoy the same kind guidance !

In fact, had I not had such cicerones I should have feared to enter that mysterious native town, in which the charm of the locality is to be found. But, after a most interesting walk with Mme. Cape, and after an unforgettable lunch in an Arab restaurant, I felt quite fearless in my new surroundings.

This transit from Europe into Africa demands a volume for description.

I could give the menu of this impressive meal, I could even depict the large wooden spoon, which was our only aid, but as for expressing the feeling of being in such a medley of black folk and varied garments, I am quite incapable.



Kaj kia kontrasto ! Matene manĝante ĉe Araba domo, kaj vespere dinante kun la Esperantistoj ĉe bela salono aŭskultante aron da kleraj muzikistoj.

En tiu tago, pli ol iam antaŭe, mi komprenis kiom mi gajnis, lerninte Esperanton. Miaj kunvojaĝintoj nepre ne povas havi tiajn plezurajn memorojn de la bela "Diamanto de la maro," kiel oni poete nomas la blankan kaj verdan Alĝeron.

Estis malĝoja momento kiam mi devis forlasi mian unuan Afrikan urbon !

La sekvantan tagon ni naĝis laŭlonge la interesan marbordon, kaj posttagmeze granda plimulto da la ŝipanoj tre interese aŭskultis pro-Esperantan paroladan en la salono. Vespere oni vidis multajn Unufoliegajn sur la ferdeko.

Estis signifa fakto ke almenaŭ du jam aĉetis lernolibrojn, kaj la plej granda nombro jam konis iom pri la lingvo.

Mia Alĝera sperto tute kuraĝigis min kiam mi alvenis en tiun ĉarmegan urbon, Tunis. Kvankam mi ne renkontis la tie loĝantajn Esperantistojn, mi neniel ŝanceliĝis eniri la antikvan urbon, restoraciojn kaj mond-famajn bazarojn tute tiel, kiel mi estis de longaj jaroj Tunisano.

Sed, por miaj nunaj legantoj, ne estos konvene, ke mi detale priskribu tiun urbon, sed estos pli bone ke mi tuj rapidu al bela Maltujo, la fruktodona insulo kies estinta historio estas tiel sanga kaj interesplena.

Ĉe antaŭ la ŝipo haltis en la haveno mi rekonis niajn energiajn kunbatalantojn, <sup>Dr<sup>o</sup></sup> Busuttill & <sup>Sr<sup>o</sup></sup> Agius kaj Dominic Chiantar.

Tiuj ĉi tri sindonemaj amikoj afable veturigis min tra la belaj ĉirkaŭaĵoj, kaj kondukis min en la luksegan ĉambregon de la antikvaj Kavaliroj de S. Johano, kaj en diversajn preĝejojn. Ili volu denove akceptu miajn dankojn !

Kaj ĉiam kaj ĉie la sama lingvo, sen malfacileco komprenebla !

Sed ne al Maltujo mi finigis mian Esperantan vagadon, ĉar, post varmega vizito al la interesa Syracuse, mi trovis ĉe Palermo la afablan Doktoron Nalli, Sekretario de la Sicilia Societo. Li sondoneme dediĉis al mi tutan tagon, kaj pruvis al mi ke tiu kiu ne vizitis Palermon mankis tute ĉarman urbegon.

Tie ankaŭ mi havis bonegan matenmanĝon laŭ Palerma maniero, dum miaj kunvojaĝantoj perdis pli ol du horojn ĉe granda hotelo Franca.

**KIAM EN ROMO, FARU KIEL FARAS ROMO !**

Ja saĝa proverbo, kaj tiu kiu ne sekvas ĝin konsilon neniel povos plene ĝui alilandan vojaĝon. Sed por ĝin plene efektiviĝi estas kompreneble necese paroli aŭ la nacian aŭ la internacian

And what a contrast ! In the morning eating in an Arab house, and in the evening dining with Esperantists in a fine hall, listening to a band of able musicians !

That day, more than ever before, did I understand how much I had gained through having learned Esperanto. My fellow voyagers can certainly not have the same pleasing memories of the "Diamond of the sea," as the white and verdant Algiers is poetically called.

It was a sad moment when I had to depart from my first African city !

Next day we glided along the interesting coastline, and in the afternoon the majority of the passengers listened with interest to a pro-Esperanto talk in the saloon. In the evening many Broad-sheets were to be seen on the deck.

It is a significant fact that at least two had already got textbooks, and most knew something of the language.

My Algerian experience quite braced me up when I arrived in that most charming city, Tunis. Although I did not meet the Esperantists residing there, I did not hesitate to enter the Old Town, restaurants, and world-famed bazaars just as if I had resided in Tunis for long years.

But, for my present readers, it is not well that I should describe this city, but better that I should hasten to beautiful Malta, the fruitful island whose past history has been so bloody and full of interest.

Even ere the ship had come to a standstill in the harbour I recognised our energetic comrades, Dr. Busuttill and Messrs. Agius and Dominic Chiantar.

These three devoted friends kindly drove me over the beautiful surroundings, and took me into the luxurious hall of the Knights of St. John of olden time, and into various churches. Will they kindly accept my renewed thanks !

And ever the same language, intelligible without difficulty !

But it was not in Malta that I terminated my Esperantic wanderings, for, after a broiling visit to the interesting Syracuse, I found in Palermo the genial Dr. Nalli, Secretary of the Sicilian Society. He kindly devoted a whole day to me, and proved that he who has not visited Palermo has missed a city of many charms.

There also I enjoyed an excellent lunch *à la Palerma*, while my fellow tourists lost more than two hours waiting in vain at a French hotel.

**WHEN IN ROME, DO AS ROME DOES !**

Truly a wise proverb, and he who follows it not can in no way fully enjoy a foreign tour. But to carry it out completely it is of course necessary to speak either the national or the international

lingvon, kaj mi persone trovis tiun ĉi la pli facilan kaj plezurigan el la du !

Tiun vesperon la menuo de la dinero sur la ŝipo presiĝis Esperante.

Kaj nun, rilate la Esperantistoj, mia vojaĝo finiĝis. De komenco ĝis fino unu longa senmakula plezurplena transiro de unu paradizo ĝis alia.

Ajaccio kaj Villefranche ne estas ĝis nun notindaj Esperantaj luliloj.

Efektive, miaj legantoj ne devas malkontentiĝi kiam ili eklernas ke mi ne plu vizitis Esperantistojn. Krom apud Ajaccio, kie mi hazarde renkontis nian eminentan botaniston kaj kunverkanton, S<sup>ro</sup> Clarence Bicknell, kiu, portante la verdan stelon en la butonruo, serĉis kreskaĵojn en kampeto, mi ne vidis konatan samideanon ĝis mia reveno en Londonon.

Tiel mi trafis mian deziron, kaj ĝuis la tutan ŝanĝon kiun postulis la sano. Kaj, vere, kiam mi forlasis la belajn artoplenajn urbojn de Italujo, kaj ĝiajn ŝongindajn lagojn, kaj diris "Ĝis la revido" al la turist-plena Svisujo, mi ektimis ke mi ja estis forgesinta Esperanton !

Tia devas esti tuta ŝanĝo, ne vere ?

Sed mi nun ĝoje trovas ke la fingroj kuras sur la klavoj de la skribmaŝino preskaŭ tiel facile kiel antaŭe, kaj ke la monta neĝo ne sukcesis malfluidigi la fluon de Esperantaj pensoj.

Je konkludo, mi konsilas ĉiujn kiuj povas fari tian vojaĝon : ne ŝanceliĝu, sed iru morgaŭ, kaj ankoraŭ, se eble, postmorgaŭ. Kaj oni estas permesita bedaŭri ke oni ne ankoraŭ iris hieraŭ—sed tiu lasta estas eble iom nesaga !

language, and I personally found the latter the more easy and pleasurable of the two !

That evening the menu on board was printed in Esperanto.

And now, as far as concerns the Esperantists, my journey had come to its termination. From beginning to end one long unmarred pleasant transition from one paradise to another.

Ajaccio and Villefranche are not, up to the present, notable Esperanto cradles.

In fact, my readers must not be disappointed when they learn that I no longer visited Esperantists. Except near Ajaccio, where I casually met our eminent botanist and contributor, Mr. Clarence Bicknell, who, wearing the green star in his buttonhole, was searching in a little field for plants, I did not see a known Esperantist until my return to London.

Thus I carried out my wish, and enjoyed the thorough change which health demanded. And, in truth, when I left the fine art-full cities of Italy, and her lakes to be dreamed of, and had said *Au Revoir* to the tourist-haunted Switzerland, I had begun to fear that I had forgotten Esperanto !

Such should a thorough change be, is it not so ?

But I now gladly find that the fingers run over the typewriter keys almost as freely as of old, and that the mountain snow has not succeeded in freezing the flow of Esperantic ideas.

In conclusion, I advise all who can take such a journey : hesitate not, but go to-morrow, and, if possible, on the day after to-morrow also. And one may be allowed to regret that one did not go yesterday as well—but this last is somewhat unwise, maybe !

## "LA LEONOJ DE LA ARBARO DE GIR. (HINDUJO, N.W.)."

Eltiraĵo de l' "Madras Mail" de l' 15.3.'05, de H.K.G.

La melfeliĉo, kiu ĵus okazis ĉe la Katiawar Arbaro, kiam Majoro Carnegie mortigis de leono, malĝojmaniere atentigas al la stato de leonoj Hindaj.

Estas ĝenerale konjektita ke nuntempe ekzistas tre malmultaj leonoj en Hindujo (la diferenco, inter la Afrika kaj Hinda leono, estas bonekonata : la Hinda estas senkolharo).

Tamen, tiu kredo de nelonge estas pruvita tute erara. Pro nedisputeblaj postsignoj ilia nombro estas nune kalkulata ĉirkaŭ 100.

Plie, tiuj ĉi leonoj fariĝis pli sentimaj ol antaŭe : iliaj postsignoj troviĝas apud domoj apartigitaj,

vilaĝoj, kaj eĉ urboj. Ili elportis bestojn el limoj de la Kolegio Ĉefurba : la vilaĝanoj ne volas vojaĝi krom grupe, kaj kun armiloj, kaj lanternoj, kaj eĉ tiamaniere time.

La kaŭzo de la plimultiĝo estas simpla : la Arbaro Gir'a dum multe da jaroj estis gardita por ĉaso : granda spaco estas netrapasita de homoj, kaj estas malmulte konata.

Por savi la vivojn homajn kaj bestajn, kaj por eksigi perdon je la malriĉaj vilaĝanoj, la tempo venis por detrui tiujn ĉi leonojn ĝis ilia nombro estos multe malpliigata, kaj ĝis la danĝera brutaro estos forpelata ree en siajn profundaĵojn arbarajn.





# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĜE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.  
FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Myba, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

**N.B.**

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtmarkon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio larv bezono korektos.*

**N.B.**

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj larvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

21. [Vol. II., No. 7.]

JULIO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13. 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## MONATO POST MONATO.

## MONTH BY MONTH.

La Brita Esperanta Asocio havis, je la komenco de la monato, sian unuan duon-jar-kunvenon ĉe Essex Hall. Kolonelo Pollen, C.I.E., V.D., LL.D., la Prezidanto, prezidis.

Post interesa parolado kaj resumo de la financa situacio, kiu jam klarigis aliloke, oni alvenis al la ĉefa devo de la kunsido—la konfirmo de la proponita regularo.

Tiu ĉi regularo ja estis treege longega, kaj la komitato devas esti pripensinta ĉiajn eblajn okazojn. Enfine, post malmultaj plibonigoj, ili konfirmigis, kaj ĉiuj kiuj volas ilin legi, povas aĉeti ilin ĉe la B.E.A., 13, Arundel Street, Strand, W.C.

Estas nia espero ke ĉiuj varmaj aprobantoj fariĝos Fratuloj de tiu Asocio. Ni mem tre kontente estus farintaj same; sed, kiam ni eltrovis, ke estus necese konstati ĉion, kion oni faris pri, pro, per kaj por Esperanto por pruvi, ke oni meritis la honoron, kaj ankaŭ devus trovi tri atestantojn por pruvi, ke oni estas sufiĉe respektinda, ni devis forlasi la proponon, kaj restas nur simpla membro, tamen ne malpli fervora pro tio!

Ni kore esperas, ke la B.E.A. ne sendos tiun longegan regularon. k.t.p., al ĉiuj personoj, kiuj proponas aniĝi estonte, alie, se ni ne eraras, la B.E.A. trovos, ke iliaj eblaj estontaj membroj havos nek tempon, nek volon, tralegi la ĉion, kaj, sekve, neniam sendos la kotizaĵon!

Inter la novaj eldonaĵoj ricevataj dum Junio estis tre originala verketo, "Une heure d'Esperanto,"

The British Esperanto Association held, at the beginning of June, its first half-yearly meeting in the Essex Hall. Colonel Pollen, C.I.E., V.D., LL.D., the President, was in the chair.

After an interesting speech and a synopsis of the financial situation, which has been explained elsewhere, the chief purpose of the meeting was broached—the confirmation of the proposed regulations.

This set of rules is indeed exceedingly lengthy, and the committee must have considered all sorts of emergencies! Finally, after a few amendments, they were confirmed, and all who desire to read them can purchase them from the B.E.A., 13, Arundel Street, W.C.

It is our hope that all warm supporters will become Fellows of that Association. We ourselves would gladly have done so; but when we discovered that it would be necessary to declare all that one had done for Esperanto, in order to prove that the honour had been merited, and also to find three witnesses to prove one's adequate respectability, we had to forsake the intention and remain merely an ordinary member, but none the less devoted on that account!

We heartily trust that the B.E.A. will not send this lengthy set of regulations, etc., to all persons proposing to become future members, otherwise, if we err not, the B.E.A. will find that their would-be future members will have neither the time nor the desire to wade through the lot, and, in consequence, will never send in the subscription.

Among the new publications received in June was a most original little work, "An Hour of

verkita de la energia pro-blindula propagandisto Profesoro Cart. Ĝi estas diologo per la Franca lingvo, ĝis la alveno de "L'Etrangère," kiu parolas Esperante. Franc-legantaj Esperantistoj saĝe sendos 50c. al 33, rue Laccépède, Paris, por ricevi ĝin.

S<sup>ro</sup> Motteau nun pretigas tradukon de *Ŝi kliniĝas por Venki*, dramo de Sheridan. Ni esperas eldoni ĝin antaŭ la Kongreso. Ĝi estas samkosta kun la *La Ventego*, kies unua Arta Eldono elĉerpigis. Oni do povas nune aĉeti la art-tukan eldonon, kun ilustraĵoj, je kosto 2f. 60c., afrankite.

D<sup>ro</sup> Martyn Westcott, kies nomo estas tiel bone konata pro liaj ŝataj rakontoj sur niaj paĝoj, verkis tradukon de la *Kristnaska Kanto*, de Dickens. Ĝi estas eldonota, kaj estos valora aldono al nia Internacia Biblioteko.

Multaj samideanoj kontente lernos, ke la Londona Klubo havos sian unuan ekzamenon por Atesto pri Kapableco ĉe St. Bride's Institute, Fleet Street, Julion 7, je la sepa horo. Partoprenantoj je tiu ĉi unua Brita Ekzameno nur devos pagi 1f. 70c. (anataŭ la kutiman 3f.), kaj ni esperas ke la nomaro de granda nombro (almenaŭ de la Londonaj anoj) povos presiĝi antaŭ la venonta Kongreso. Tiuj, kiuj deziras ekzameniĝi, povas ricevi ĉiajn sciigojn de la B.E.A., 13, Arundel Street, W.C., kaj devos sendi siajn nomojn al la Hon. Sek. de la Londona Klubo, 14, Norfolk Street, Strand, antaŭ Julio 5.

Esperanto" (*Horo pri kaj per Esperanto*), by Prof. Cart. It is a dialogue conducted in French, until the arrival of "The Foreigner," who speaks in Esperanto. Readers of French will wisely send 6d. to 33, rue Laccépède, Paris, to obtain it.

Mr. Motteau is preparing a translation of Sheridan's drama, *She Stoops to Conquer*. We hope to publish it before the Congress. It is uniform with *The Tempest*, the Art Edition of which is sold out. One can, however, at present obtain the art-cloth edition, illustrated, for 2s. 2d., post free.

Dr. Martyn Westcott, whose name is so well-known on account of his popular narratives in our pages, has translated Dickens' *Christmas Carol*. It is about to be published, and will be a valuable addition to our International Library.

Many friends-in-Esperanto will gladly learn that the L.E.C. will hold its first examination for Proficiency at St. Bride's Institute, Bride Lane, Fleet Street, E.C., on July 7th, at 7 o'clock. Competitors in this first British Examination need pay only 1s. 4d. (instead of the usual 2s. 6d.), and we hope that the names of a goodly number (at any rate of the London members) may be printed before the coming Congress. Those desirous of being examined can obtain all information from the B.E.A., 13, Arundel Street, W.C., and must send in their names to the Hon Sec., London Esperanto Club, before July 5th.

## SAVITA DE MORTO.

Originale verkita de Generalo George Cox.

### ĈAPITRO I.

"Vi mankos la vaganaron, sinjoroj, se vi ne rapidos," ekkriis la hotelportisto, kiu staradis malantaŭ ni ĉe la eniro de la hotelo, portanta en mano tualetsakon kaj kelkajn paketojn.

"Atendu momenton, dum mi kuras al la hotel-oficejo por ricevi mian monujon," diris la maljuna sinjoro.

"Jen mi! tute preta!" li ekkriis post momento, lamirante al ni tra la koridoro tiel rapide kiel li povis, "estis tri cent livra bankbileto en mia monujo, tial mi pensis, ke estos pli senriske ĝin lasi en la oficejo, ĉar mi havis aferojn en la urbo hodiaŭ posttagmeze; kaj Londono ne estas la plej sendanĝera loko en la mondo ĉirkaŭporti en poŝto tri cent livrajn bankbiletojn! Ĉu ne vere?"

"Apenaŭ," respondis mia frato, ridante, kiel ni ĉiuj tri rapidiris sur la fervojan trotuaron, sekvataj de la hotelportisto, "se mi havus unu, mi bone scias, ke mi ĝin perdus dum malpli ol kvin minutoj."

"Dum kvin minutoj," ekkriis la maljuna sinjoro, turnante sin rapide. "Kiel?"

"Nu! ĝi bruligus truon en mia poŝto," rediris mia frato.

"Ha! ha!" li ridis. "Mi rememoros tion, kaj diros al mia edzino, kiam mi alvenos hejmen, ke mi perdis la monon, kiam Vilĉjo, mia filo, devus kunpreni kun li al Nova Zelando! Kia stato de turmento ŝi enestos! Kaj kiam ŝi estos fininta min demandi, kiam kaj kie mi ĝin perdis, kaj kiel mi povis esti tiel senzorga kaj malsaĝa." Tiam mi respondos, "Ĝi bruligus truon en mia poŝto!" "Ha! ha! kiel kolera ŝi estos, ke mi ŝercis pri tiel grava afero! kaj kiel Vilĉjo ridegos! Sed, jen estas la vagonaro. En kia klaso vi vojaĝas?" li diris al mi.

"La dua," mi respondis.

"Nu, mi do diros al vi adiaŭ, ĉar mi ĉiam vojaĝas en la unua. Ĉe mia tempo de vivo, mi trovas, ke mi devas doni al miaj maljunaj ostoj kiel eble plej multe da ripozo!"

Mi tiom amuziĝis je la stranga maljunulo, ke mi diris: "Ho! ne. Mi kunvojaĝos kun vi, kaj pagos la kostdiferencon en Brighton."

"Mi ne volas ke vi elpezu monon miakaziĝe," li respondis.

"Ho! ne signifas," mi diris, "estos nur bagatelo." Mi do lin sekvis en unuaklasan kupeon, kiu estis neokupata.

La portisto enmetis la paketojn; mi diris adiaŭ al mia frato kaj sidigis min en angulo de la kupeo kontraŭ la maljuna sinjoro, kaj ni forveturis.

## ĈAPITRO II.

Kaj nun, dum la vagonaro forrapidegas al Brighton, permesu al mi diri malmultajn vortojn pri mia familio kaj mi mem.

Mia patro, maljuna generala oficiro, estis mortinta antaŭ kelkaj jaroj. Post lia morto, mia patrino, kiu havis nur sian vidvinan pension kaj proksimume centlivrojn ĉiujare, loĝis en Brighton, por pli ekonomie eduki miajn du fratinojn, unu el kiuj estis nun plenkreska, kaj la alia ĉe lernejo en la urbo. Mia pli maljuna kaj sola frato, Karlos, de kiu mi ĵus disigis ĉe la stacidomo, estis, antaŭ ne longe, fininta aranĝi siajn vespermangojn<sup>1</sup> ĉe la *Inner Temple* (lega kolegio), kaj nun kredis sin plene sur vojo al elokventeca gloro!

Pri mi mem, ĝi estu mallonge dirita, ke mi estis, antaŭ kelkaj monatoj, preninta mian B.A. gradon ĉe Cambridge. Unue mi estis difinita por la legoscienco, sed militama fervoro, nedube heridita de mia patro, kontraŭkuris la dezirojn de mia patrino, kaj mi malfacile ricevis sian konsenton ŝanĝi la robon por la glavo. Pro tiu ĉi celo, mi iris Londonon por prezenti min antaŭ komitato de eminentaj militkuracistoj ĉe Whitehall. Fiera pri miaj atletaj faroj en la universitato, mi uzas la okazon por diri al la tri gravaj eminentuloj, kiam ili demandis min pri mia sano, ke mi kredas ke ne

estu multe da timo ke mi havu ian korpan malsanon, ĉar mi remis en la boato kiu estis "ĉefo de la rivero" lastan Majon ĉe Cambridge, kaj ankaŭ, ĉe Henley, en Julio gagnis diversajn boato-konkurojn. Miasurprize, ili min sciigis, ke tiaokaze, ili devas fari tre zorgan ekzamenon, ĉar atletaj sinjoroj ofte ne estas tiel sanaj, spire kaj membre, kiel ili mem imagas. Tial, anstataŭ supraĵa ekzameno, kiun mi atendis, me devis suferi severan provon. Oni igis min senvestigi, salti super benkojn, salteti jen per unu piedo, jen per la alia; mi devis legi per unu okulo, tiam per la alia; miaj dentoj, pulmoj, kruroj, brakoj, oreloj, manoj, piedoj, fakte mia tuta korpo estis zorgege ekzamenata, ĝis kiam mi ekpensis, ke mi estas ĉevalo vendota sub la serĉaj okuloj de bestokuracisto! Tamen, fine mi estis certigata bonsana kaj konvena aspiranto por pulvo kaj kuglo.

Lasante *Whitehall*, mia militfervoro estis neniel estingata; ĉar mi tuj tutĝoje marŝis al la *Temple* (legkolegio); allogis mian fraton de lia *Coke upon Littleton* (leglibro), por ke li venu kun mi aĉeti turn-pafilon. Aĉetinte tiun ĉi, mi ordonis al la armilaristo ke li sendu ĝin al la *Grosvenor Hotelo*, adresita al Sinjoro Georgo Middleton; kaj tiam, tial ke mia frato estas tro okupa por veni kun mi al mia tajloro, ni disigis, li promesante, ke li vespermangos kun mi en la hotelo je la sepa.

Je la sepa mia frato alvenis, kaj ni sidigis ĉe tablo en la mangoĉambro. Apude estis malgranda maljuna sinjoro, kiu, post kelkaj rimarkoj pri la vetero, varmeco de la ĉambro, kaj cetere, demandis ĉu li povas unuigi kun ni. Ni volonte konsentis, kaj li sidigis ĉe nia tablo.

Li gajigis nin multe per siaj mallongaj lertaj ekzemploj de vivo kaj karaktero en preskaŭ ĉiu parto de la mondo. Evidente li estis homo kiu estis multege vojaĝinta, kaj ne estis forgesinta tion, kion li vidis. Tio ĉi, kune kun la iom kurioza, sagaca modo per kiu li rakontis siajn spertojn, igis lin plej agrabla kunulo, kaj mi multe ĝojis, kiam mi ektrovis ke ni estas vojaĝontaj al Brighton en sama vagonaro. Kaj nune, jen estas ni ambaŭ rapide forveturantaj po kvindek mejloj la horon al nia celo.

(*Daurigota*).

## PINO.

### El Hejne-Lermontov.

En nordo sovaĝa, sur nuda supraĵo  
Balancas sin sola la pin',  
Kaj dormas, vestita en neg' ŝutiganta,  
Kaj revas pri sia fratino'.

Ŝi songas, ke ploras sur monta krutaĵo,  
En lando de suna surir',  
En fremda dezerto kun sablo brulanta,  
La palmo belega je mir'.

Vs. LOJKO.

## ERMITO PRESKAŬ MODERNA.

Originale verkita de E.W.

Mi vizitis onklon kiu loĝis sur monteto apud kies piedo kuŝas la marborda urbeto, Cromarty. Unu tagon alvenis la pastro de la proksima *Libera preĝejo*. Li nin sciigis ke li ĵus venis de interparolado kun viro la plej spirita el ĉiuj liaj konatoj, la ermito de Navity. Mia onklo tiun ĉi ne konis, kaj respondante al liaj demandoj, S<sup>ro</sup> Stuart diris ke estis solulo kiu antaŭ dekkvin jaroj venis al stepo dezerta kaj konstruis budon apud sankta fonto kie antikve multe da malsanuloj mirakle kuraciĝis. Tie li vivadis sola, manĝante nur la kreskaĵojn el lia peco da tero, trinkante nur akvon portante somere kaj vintre maldikan eluzitan militan uniformon multe flikitan. Ĉiun dimanĉon li venis al la preĝejo, malproksima de 4—5 mejloj de sia budo, religie kantis kaj atente aŭskultis la Diservon. Ĉiam li metis en la kolektujon (por vidvinoj kaj georfoj) argentan moneron, sed neniam li elparolis vorton. Al viroj lin adresantaj li respondis per saluto milita, al virinoj li ja ne mem ekrigardis, kvankam multaj el tiuj ĉi, bonkoraj kaj komputaj penis konatigi kun viro tiel stranga, tiel sola. Dum preskaŭ dekdu jaroj la Cromarty anoj pli malpli lin respektis, ili havis antikvan tradicion ke la granda juĝo de vivantoj kaj mortintoj okazos meze la dek naŭan centjaron sur la stepo de Navity. Ili do kredis ke li devas esti sanktulo treege avida vidi kaj bonveni sian Savinton. Poste ilia opinio pri li multe ŝanĝiĝis.

Kelkaj bovinoj mortis, multaj ĉevaloj lamiĝis, iuj riveretoj sekigis kaj preteririnte lian loĝejon oni vidis fumon supreniri el lia tegmento, oni aŭdis strangajn voĉojn kunparoladi. Tro certe estis ke li kunulo estas de la Diablo; iuj eĉ diris ke peko mortiga estus permesi al sorĉisto pli longan vivadon en lando Kristana.

La afero fariĝis gravega kaj la pastro sin kredis devigita sin intermeti. Li iris ĉe la ermito. Oftege li jam frapis al la malalta pordo, oftege li petegis, vane petegis, vorton de respondo, iafoje li tie longatempe restis, ĉar li rigardis la malfeliĉulon kiel ŝafo el sia zorgitaro. Tiun ĉi tagon li tuj invitigis eniri kaj vidis du fratojn. Robbie la nove alveninto kuŝas sur la tero febropapita kaj silenta. S<sup>ro</sup> Stuart aŭdis ilian simplan historion. La ermito lasis la militistaron post 20 jaroj da servado alportante atestojn de bon-konduto kune kun bona saneco kaj pensio kiun li ĉiu-monate ricevas ĉe la ĉefurbo de la apuda graflando. Robbie estis plektisto ĝis sunfrapo kaj kordoloro pri la

morto de lia edzino lin malsagiĝis. Li estas neniam danĝera nur simpla kaj ĉiam melankolia. La pastro kaj la ermito fariĝis preskaŭ amikoj, sed ilia interrilato estas severe limigita al interŝanĝo de libroj kaj al ne oftaj kunvenoj (vizitaj) ĉe la fratoj.

Aŭdinte tiun ĉi rakonton mi multe deziris konatigi kun viro tiel aparta kiu, vivante en klimato malvarma, preskaŭ tute sin refuzis fajron kaj aĉetis nur librojn. S<sup>ro</sup> Stuart diris ke estas neeble ke mi lin vidos ekster la preĝejo, ĉar vidante virinon alvenante ĉe li, rapide li forkuros.

Hontema mi konfesas ke mi tiam ne ankoraŭ postvivis la sensencan ambicion venki malfacilaĵojn kaj kontraŭadon. Mi decidis viziti la ermiton kaj mia bona onklo, kiu neniam al mi ion rifuzis, min kondukis al stepo ĉe Darnie. Mi haltis post arboreto, la sola sur tuta la stepo, li frapis la pordon, vidis la ermiton kaj diris "Volu aminde montri al mi la sanktan fonton" kiam mi vidigis li aldonis "al mi kaj al mia nevino kiu venis el Anglujo." Silente Darnie marŝis antaŭ ni ĝis la bordo de la valetto, tiam li sin turnis, dirante "Kolonelo, ĉu la nobla fraŭlino volas teni mian manon? La vojo estas ja krutega." Mi metis mian maldekstran manon en la lian kiu estas tiel glaciacia ke mi min promesis neniam ree marŝi manenmano kun ermito; baldaŭ ĝis al kubuto mia brako rigidigis per la malvarmeco. Kiam ni la tuton vidis kaj la deklivon supreniris, li diris "Kolonelo, la fraŭlino ŝajnas tre laca, eble estus bone ke ŝi sin ripozus ĉe mi." Ni eniris en la budo kiu estis peceto da tero enfermita per torfmuroj, kun tegmento de branĉetoj, torfo kaj eriko. Ĝi havis nek fenestron nek kamentubon nur truon en la muro por eniro de la lumo kaj truon en la tegmento por eliro de la fumo. Anstataŭ tablo staris sur kvar ŝtonoj granda kesto, du skabeloj plenigis la meblon. Robbie sidis sur la tero apud fajro de torfo seka kaj abilignetoj varmiganta siajn longajn palajn manojn. Kun li aŭ plivere al li parolis mia onklo dum Darnie al mi montris siajn librojn. En la keston, falditajn en tuko nepenetrebla mi vidis Biblion kun komentario, en kvar volumegoj, la "paradizo perdita" de Milton, ses volumojn de la verkoj de Shakespeare kaj ĉirkaŭe dekduon da aliaj libroj bele binditaj. Li tuis siajn librojn kvazaŭ kun adorado. Poste li montris al ni la kreskaĵojn en sia ĝardeno, disrompis la solan rozon de la sola rozujo kaj ĝin donis al mi dirante "Neniam ni revidos la unu la



alian." Hejme vespere mia onklo multe ridis pri nia eksplorado, li skandalegis mian bo-onklinon per opinio ke "Darnie sin trovante (malsimile al Santo Dunstano kaj S<sup>to</sup> Antonio) neproviza je ruĝvarmega prenilo, provis favorigi la Diablon per flora donaco." Estas li kaj ne ŝi kiu unue volis scii kial viro inteligenta tiamaniere vivadas. Ili demandis al pastro, kiu diris ke vane li mem penis eltrovi la kaŭzon sed li certege kredas ke ĝi ne estas malbona nek malhonora. Post du aŭ tri semajnoj ni promenis kun du sinjorinoj kaj du knaboj. Amiko pruntis por uzo de tiuj ĉi, ĉevaleton kiu ne plu estas sufiĉe granda por porti liajn plenajajn filojn. Malbonŝance la besto estis longatempse senlabora kaj fariĝis tro petola; ĝi forĵetis unu knabon, kuŝiĝis sub la duan, ruliĝis sur la tero, kaj kiam oni ĝin devigis stari ĝi piedfrapis, dancis sur la postaj kruroj, kaj penis mordi. Estas do necese ĝin venki se oni iam farus uzon el ĝin. Mia onklo estanta tro multepesa por ĉevaleto, kaj lia edzino ne povante sen malrespekto forlasi ŝiajn gastinojn mi havis la plezurajn aferojn.

Mia onklo alttenis unu el ĝiaj antaŭpiedoj dum mi rampis sur la selon kaj ni rapide forkuris. Mi tute ne povis kontroli la beston ekscititan ĉar mi nur malfacile povis min balanci sur la selo kies piedingaj rimenoj estis tro mallongaj por ke mi povu ilin uzi; tial mi sen sinriproĉo ĝuis la galopon, ĝis mi subite min trovis sur la herbo. Mi falis kiel kato sur la piedoj kaj ankoraŭ mi tenis la kondukilojn, tial mi deturnis la ĉevaleton al arboreto, kie mi disrompis branĉeton kovritan per folioj. Neniam mi frapis bestojn sed iafoje mi tiklis ilian nazon aŭ orelojn por sciigi ilin ke mi ĉeestas aŭ por ilin vekigi se ili estas dormemaj. Mi ne deziris duan falon kaj mi estas certa nenion renkonti mi do sidiĝis sur la selon tiel kiel rajdis la kamparanoj en Kimrujo kiujn mi ĉiutage vidis en mia infaneco. Tiam mi incitis la beston al plej rapida kuro kaj kiam ajn ĝi volis marŝi mi tremigis la foliojn apud ĝia kapo tial ke ĝi rekomencis galopon. Kiam ĝi ŝajnis sufiĉe laca por ke ĝi min obeu mi cirkaŭrigardis kaj min trovis en plena dezerto, sen vojeto kaj sen ia ideo pri la sido de la urbeto. Vere la besto facile trovas ĝian hejmon sed ĝi irus ĉe ĝia propra mastro kaj ne ĉe miaj geonkloj. Dum mi haltis duba mi vidis viron, mi do movinte mian dekstran piedon al mia maldekstra flanko lin sekvis, lin alvokis kaj kiam li sin turnis mi lin petis al mi helpi premi la selligilojn kaj montri la plej rektan vojon al Cromarty House. Li nenion respondis sed ŝanĝis la bukajn kaj prenis la bridon.

Mi diris "Volu montri per fingro kie kuŝas la urbeto; ne estas necese ke vi min akompanu."

"Estas ja necese, multaj kaj profundaj estas la marĉoj," respondis voĉon per kies sono mi rekonis

Darnie. Mi decidis respekti liajn kutimojn, sed baldaŭ, tute senvole mi ekkriis "Darnie, kial vi tiel strange vivadas?" Lian vizagon mi ne povis vidi, lian voĉon tamen estis kvietaj kiam li enfine diris "Mizerulo ne devas enui noblan fraŭlinon." "Vi ne estas Mizerulo, mi ne estas nobla. Unu estas nia patro, Dio mem; kaj ni ĉiuj estas gefratoj. Ĉu vi tion ĉi ne legis el via Biblio? Ĉu vi ĝin ne kredas? Kial vi ne konfidus en fratino?"

Post longa silento li komencis paroli tre malfacile ĉar la Angla lingvo al li estis lingvo alilanda, li rakontis al mi ke liaj prapatroj kulturis farmojn en bela valo. Li estis la plej juna el ok gefiloj kaj estis nur dekokjara kiam oni faris fervoran alvokon al la patriotismo de la Skotoj por defendi la landon kontraŭ Bonaparte kaj li soldatiĝis: post deksep jaroj li estis serĝento kaj ricevis longan libertempon. Revidante sian familion li trovis plenan feliĉecon. Gepatroj gefratoj, geonkloj, gekuzoj, estis sanaj kaj prosperaj, liaj fratinoj estis ĝojaj edzinoj kaj patrinoj; bona knabino kiun li de ŝia infaneco amis lin feliĉege bonvenis. Ili fianĉiĝis, post nur tri jaroj, lia deĵoro elfarita li revenos, libera, riĉa al la kara valo, al la karega virino, por ĝui inter iliaj parencoj vivon paradizan.

La tri jaroj pasis, de Hindujo li rapidis hejmen kaj trovis la valon sed de la vilaĝo nur fajrenigrigitajn ruinojn. Li marŝis longatempse antaŭ ol trovi dometon kies timigitaj loĝantoj lin diris ke ĉiuj vilaĝanoj forpeliĝis por ke la bienulo obtenu plian luprezon el riĉaj ŝaffarmaj mastroj. Li iris al pastra domo kie li bonege ricevigis sed la pastro povis al li nenion sciigi pri liaj parencoj. El la 350—400 loĝantoj, kelkaj iris Amerikon, kelkaj (surtute teksistoj) migris en la urbojn kelkaj mortis pro malvarmo, malsato kaj melankolio. La pastro diris al Darnie ke li devas akcepti siajn malĝojigojn tiel justa dia puno pro liaj eblaj formetitaj ŝuldoj de preĝo. Ankaŭ li promesis lin sciigi se iam venas al valo iu el liaj parencoj. Lasinte la valon Darnie renkontis amikino kiu lin diris ke la forpeloj kruelege efektiviĝis. Ŝi vidis lian patron svenigitan per ŝtonbatoj, lian patrinon devigeble eltrenitan el lito kaj forĵetitan sur malsekan herbon; tie post nokto mizera ŝi mortis. Dum kelkaj semajnoj Darnie ĉirkaŭe vagis, penante trovi iajn sciigojn pri sia familio aŭ pri la familio de sia fianĉino, lasante ĉie la adreson de la oficejo al kie li iros por sia pensio. Enfine li loĝiĝis al Navity kie post dekdu jaroj li aŭdis pri sia frato.

Al mi demandinte kial li elektis restadejon tiel dezertan li respondis "Ĉar mi timegis fariĝi mortiganto, ju pli mi aŭdis pri la suferoj de miaj popoloj des pli mi deziregis vengon. Mi ne kuragiĝis min meti en tentado se mi. . . . Tiun riĉulo mi ne povos pardoni. Mi volis pardoni por ke mi estu

apud mia amatino al la mano dekstra de Dio—tie mi ne estos ĉar mi neniam pardonos, sed ŝi scios ke mi ŝin iam amegis, al ŝi ĉiam mi restis fidela.”

“Unu tagon vi ja pardonos Darnie.”

“Neeble, mi jam forgesis. Mi jam estas kvazaŭ mortinto ne sentante. Dum longaj jaroj mi preĝis povi pardoni, tutajn noktojn mi staris sur la genuoj aŭ kuŝis sur la vizaĝo preĝante povi pardoni—nun mi ne povas plu preĝi.” Li pli multon diris sed mi ne aŭskultis: mi pensis kaj preĝis. La domo estante videbla mi diris,

“Adiaŭ frato mia, iru hejmen kontenta. Dio vin ja longe pardonis, ĉar li vin amis, eterne. Li vin amos.”

Je la unua fojo li atlevis la okulojn kaj min regardis “Adiaŭ, fratilino, ĉu vi estas vere fratilino aŭ anĝelo sendita de Dio?”

P.S.—Dum dekdek jaroj mi neniam parolis pri Darnie ĉar mi timis perfidi lian konfidencan. Tiam lin kredante morta mi rakontis lian historion al amiko mia; nun mi ĝin skribis.

E. W.

## LA HISPANA ARMŝIPARO.

De Lord Macaulay, tradukita de Ben Elmy.

Atentu, se sciĝus vi pri Angla la virec’;  
Mi kantas kion faris ĝi en fama l’ estintec’;  
Ŝiparo vane kontraŭ ĝi alportis, sur marflu’;  
Meksikan oron, bravajn korojn, for el Hispanuj’.

Jen estis dolĉa tagfiniĝ’ en suna la somer’;  
Ŝip’ Angla flugis al haven’ de la Devon’a ter’;  
Tagiĝe jam ekvidis ĝi, sur la Aŭrinja mar’;  
Grandegajn nigrajn ŝipojn el Hispana la ŝipar’;  
Ĝi ilin ekevitis ĉe la frua sunleviĝ’;  
Sed poste, ĝis la tagomez’ daŭradis la ĉasiĝ’.  
Tuj ĉia urba pafileg’ metiĝis sub gvardi’;  
Ekflamis tuj signalofajr’ de l’ alta bateri’;  
Forflugis multaj ŝisbarketoj serĉi pri l’ afer’;  
Kun sanga aprono rajdis for tre multa kurier’.  
L’ urbestro, griza maljunul’, almarŝas en mezur’;  
Kun halebardanaro, kaj batado de tambur’;  
Ĉar en la plac’ la hejmgardistoj jam kolektis sin,  
Starigi tie, laŭ komand’, standardon de l’ reĝin’;  
Fiere sonas la trompet’, kaj dancas sonoril’;  
Dum malfaldiĝas per la vent’, la reĝa blazonil’;  
Leon’ herolda de la mar’, antikva kun kroneg’;  
Liliojn, jen, trabatas ĝi per forta piedeg’.  
Tiele alpaŝadis ĝi, ĉe l’ kamp’ de Pikardi’;  
Al agloŝild’ Cezara, al plumar’ de Bohemi’;  
Tiele elrigardis kiam, apud Aĝinkort’,  
La ĝin ĉasantajn princojn ĝi oferis al la mort’.  
Salutu flagon, knab’! Alĵetu florojn, ho knabin’!  
Ektondru pafilegoj, inde reverenci ĝin!  
Ho suno, allumigu ĝin, per tuta brilo via!  
La glora “Ĉiamsama,” la standard’ fiera nia!

En vent’ vespera svingas sin la peza riĉa flag’;  
Ekbrilas ĝia oro en la lasta lum’ de l’ tag’;  
Kuŝiĝas nun la suno, tuj alvenas nokto, kia  
Neniam en Anglujo estis, nek revenos tia.  
De Ediŝtono ĝis Bervik’, Linreĝa ĝis Milford’;  
Okupe estis, kvazaŭ tag’, en tuta l’ Angla bord’;  
Jen la signaloflam’, de l’ orient’ ĝis okcident’;

Sur Mont’ Mihala brulas, kaj sur Kap’ de l’  
Orient’.

Hispanoj, do, ekvidas nun sur ĉia promontor’;  
Fajreroj biletantan kiel pint’ de viva or’.  
Fiŝist’ boaton lasis sur la ondoj de Tamar’;  
Ministoj alvenadis el Mendip’a kavernar’;  
Signal’ vidigis trans arbar’, kaj trans herbejo, ĉe  
Paŝtistoj de Stonhengo, kaj ĉasistoj de Bolej’;  
La tutan nokton en Bristol’ batadis sonoril’;  
Tricent rajdantoj venis, kun ĉevaloj kaj armil’.  
Gardostarant’ ĉe Blankdomeg’ ekvidis tral’ mallum’;  
Super monteto de Riĉmond’, iom da ruĝa fum’;  
Eksonis tuj trompeto, tuj bruegis pafileg’;  
Tuj, eksaltante je kole’, vekigis regurbeg’;  
Tuj reciproke flamas fajr’ sur urbpordego ĉia,  
Tuj sonoril’ al viglo vokas per ordono ĝia;  
La bateri’ de l’ Tur’ tondrigas veton de batal’;  
Milo da ŝipoj sur la Temz’ aplaudas al signal’;  
El ĉia part’ audiĝas nun pieda peza bat’;  
Je flagoj kaj piketangoj tuj plenigas ĉia strat’;  
Kaj pli kreskadis nun la flam’, pli laŭta estis bru’;  
Dum el proksima kamp’ plimultiĝadis homoflu’;  
Trans Nigrastepo orienten flugis la alvok’;  
Al multa Kent’a estro en antikva hejmolok’;  
Kaj suden rajdis kurier’ trans Temz’a dolĉa bord’;  
Kaj de Hamsted’a erikej’ galopis al la nord’;  
Kaj for, je l’ tuta nokt’, sen paŭz’ daŭradis la kurad’;  
De mont’ al mont’, de tur’ al tur’, senĉesa eksaltad’;  
Ĝis staris la standardo sur la Pik’a kruta front’;  
Kaj ĝis vulkane brulis ĉia alta Kimra mont’;  
Ĝis dek provincoj vidis jam flamegon sur Malvern’;  
Ĝis la Wrekin’ eksajnis nur sangruĝa nubostern’;  
Ĝis kreskis brilo sur l’ Eli’a sankta konstruaj’;  
Kaj ĉia urbo armis sin en larĝa l’ ebenaj’;  
Al Linko rapidiĝis de Belvero la signal’;  
Kaj Linko tuj forsendis ĝin trans Trent’a vasta  
val’;  
Ĝis ĉe Skidaw’ vidigis fajr’ sur Lank’a la kastel’;  
Kaj ruĝo sur Skidaw’ ekvekis burĝojn de Karlel’.

## IOMETO DA MUZIKO.

Tradukita de Alfred J. Hulme (Esp. 8688).

El "Dan Leno His Book" (Dan Leno estis la Rega Amuzisto).

Mi estas pleje memedukita viro, kaj mi estas baraktinta kun ĉiu el la artoj kaj sciencoj en "broŝura" maniero. Sed dum la tuta kurso de mia studado mi neniam havis tian ekscitan tempon kian tiam kiam mi provis plene majstrumi la sakfajfilon per sep lecionoj sen helpo de instruisto.

Mi ne precipe amis tiun muzikilon, kaj mi pensas ke mi komprenas kial ĝi malofte ludigas ĉe simfonijaj koncertoj. Sed mi havis sorbegan sciamon eltrovi ĉu mi povos fari kortuŝantan efekton porke blekante per ĝi la "Preĝon de virgulino." Mi antaŭpensis ke ĝi estos la plej kortuŝa muzika efekto iam konata.

Mia tiatempa pensiistino estis bononutrita ino, sed ŝi ne havis orelon; ŝi devis auskulti tra sia nazo, kaj kompreneble tiu malfacilo igas al ŝi antaŭjuĝon kontraŭ klasika muziko. Mia unua atenco estis ekstremiga. Mi estis ferminta la pordon kaj preninta grandan buŝplenon da la tuboj, kaj elblovinte ĝis miaj dentoj preskaŭ elfalis, mi sukcesis pleniĝi la sakon aŭ ventujon per kvanto da sudokcidenta vento.

Okazis nenio dum kelkaj momentoj; sed ĵus kiam mi estis spireganta kaj sopiranta antaŭ rekomenci, tiam la ilo ŝajne vekigis subite pro sento pri ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj komencis kriegadon, ploregadon, kaj kraĉadon. Ĝi sonis kiel tridek katoj kun iliaj vostoj en rulpremmaŝino de lavisto. Timigita, mi lasis fali la estaĵon kaj forkuris el la ĉambro. Sur la etaĝo mi ekrenkontis mian pensiistinon, kiu brake karesis min, mole kisante min ĉe la frunto, demandis "Ĉu la doloro estas kie?" Kaj informis ke "ŝia mortinta edzo foje suferis same, sed ŝi konjektas ke li neniam havis ĝin tiel malbone kiel mi."

La loganto supre mi juna viro estis forta kaj kutime malagrabra kanajlo, sed je tiu-ĉi okazo li gentiligis kaj sendis depeŝon peti "Ĉu Sinjoro Leno kompleze ĉesos kantadon, ĉar li deziris dormi."

Je la okazo de mia dua leciono, mi komencis praktiki en mia dormĉambro antaŭ frumatemango, kaj mi ekvidis tra la fenestro karan multepezan amikon mian. Li estis proksimiĝanta por inviti lin mem al matenmango.

Mi treege blovis en la aerujon, kaj tuj metis la sakfajfilon sub la littukaro kaj atendis mian vizitonton.

"Ho! maljuna viro," ekdiris la kora gasto,—"ĉu, jam vi levigis? Ĉu, plu da studado? Ne zorgu pri sego, mi sidigos sur la lavtablon."

Tia ne estis tio kion mi deziris, tial mi tuj malsekigis la lavtablon per ŝajne mallerte renversante iom da akvon.

"Nu, do, mi sidigos sur la liton," li kriis. Li sidigis sur la liton—faligis sur ĝin laŭ lia gajega maniero.

Mia sakfajfilo noble konvenis la okazon. Ju frue la dorso de mia amiko kontaktigis je la lito, des frue ekverŝigis sangorigidaj ĝemegoj kaj kriegoj el sub la littukaro.

Ĝi vere estis terura bruoj kiu haltigis ĉe mian koron. Mia amiko eksaltegis al tia alto ke li frapigis sian kapon kontraŭ la plafono. Lia hararo rekte starigis; liaj dentoj kraketis; liaj genuoj kunfrapis.

"Bona Dio! Dan!" li babilis. "Mi plej evidente estas mortiginta la infanon."

Mi neniam dum mia vivado vidis tian pentraĵon de tragedia terurego. Subite li verŝajne reatingis la uzon de liaj membroj; li ekmalfermis la pordon kaj sovaĝe kuregis straton. Mi vokis al li tra la fenestro. Mi diris, "Nenia profito estas forkuri; ni devas vizaĝe kontraŭstari tiun-ĉi malfeliĉon kaj decidi tion kion ni faros. Tuj supreniru. Se popoloj vidos vin tiamaniere agi, ili eksuspektos ion."

Tial li treme revenis, kaj mi serioze komencis diskuti kune kun li pri la konsilindeco ĉu kaŝi subplankon la korpon, kaj poste elmigri Venezuelon.

Lia vizaĝo kovrigis per la manoj, kaj li ŝajne konfuzegigis pro la penso ke lia sorto estas tute defektita. Fine li levigis, kun trankvila decido sur la vizaĝo. Li apudiris la liton kaj dolĉe tuŝis la kovrilon.

La fajfilo eksonigis kuriozan sopireton. "Dan," ploretis mia multepeza amiko, "ĝi ankoraŭ vivas! ĝi ja ankoraŭ vivas! Tiam li fortunis la littukojn."

*Faligu la kurtenon!*

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajlojn.*

Ankoraŭ mi ne diris ion pri afero kiu en la Ŝtatoj estas tute ordinara; la movigo de domoj.

Por ni Angloj estas ofte malfacile kontentigi nin: aŭ ni ŝatas domon kaj malŝatas ĝian siton, aŭ, kontraŭe, ni trovas konvenegan siton, kaj, jen, la domo, kiu staras sur ĝi, estas tute ne dezirinda; eĉ eble ne estas domo.

Sed por Amerikano la afero estas multe pli simpla. Li vidas konvenan domon kaj aĉetas ĝin. Se poste li vidas siton, kiu ŝajnas al li preferinda, li ankaŭ aĉetas ĝin. Tiam li metas sian domon sur translokigilojn kaj translokigas ĝin sur la novan siton. Li ne ĝenas sin pro la pakado de sia meblaro. Tiel lertaj estas la translokigistoj ke ne eĉ pentraĵo defalos de la muroj dum la translokigo.

Mi ne diras ke *neniam* okazas malfeliĉo, car okaze—sed mi rakontos tion kion mi vidis.

Foje promenante en urbon kiun ni nomas *New York*, mi forlasis la grandajn ŝtonajn konstruaĵojn kaj eniris straton de lignaj dometoj. Se ĝuste mi memoras ili estas apartaj, kaj havis ĝardenetojn kiuj tre similis al verdaj tablotukoj kun bordoj florigitaj.

El tiuj ĉi dometoj unu staris tute malrekte, tiel kiel se infaneto de iu el la antikvaj grandeguloj, ludante je siaj ludiloj, kiam li metis tiun ludilon sur sian naztuketon verdan, dum unu momento estus restinta kontraŭ ĝi la manon, kaj tion tuj ekvidinte estus formovinta la pezon antaŭ tute premege la domon.

Nature tiu ĉi strangaĵo vekigis mian sciamon, kaj mi informigis pri la kaŭzo de tia malrektigo.

Sed por bone komprenigi la aferon mi devas unue klarigi kiamaniere Ameriko altigas sian domon.

Li ĝuste "mal"-as nian Anglan metodon. Ĉe ni oni formetas la tegmenton kaj aldonas supran etaĝon. Ameriko, kontraŭe, altigas per altigiloj la tutan domon kaj sub ĝi konstruas *malsupran* etaĝon.

Nu; mia informanto diris al mi ke en la domo plej apude al tiu kiun mi rimarkas loĝis domkonstruisto, kaj en la kapon de tiu domkonstruisto venis la ideo altigi sian domon. Sed, ĉar li estis kredeble iom ŝparemulo li decidis ke li ne dungos istajn laboristojn, sed ĉion faros per siaj propraj salajruloj kaj iloj.

Ili vere sukcesis altevi la domon, sed (aŭ ĉar li ne bone komprenis la aferon, aŭ ĉar li ne havis sufiĉon da homoj aŭ iloj), kelkparte la subportiloj

rompiĝis, kaj la domo, falinta laŭ tiu direkto, falis kontraŭ tiun domon pri kiu mi faras demandon, kaj ĝin lasis tiel kiel nun mi vidas.

Kiel ofte mi vidas ke se Biciklanto ektuŝegas piediranton, la piediranto pli suferas. Ankaŭ tie ĉi la domo de la domkonstruisto ne montris ian ajn postsignon de sia aventuro. Oni legis la historion en la difektaĵo de ĝia neofendinta najbaro.

Foje mi legis rakonton pri la altigo de hotelo ĉe *San Francisco* por ke subpasu fervojo. Mi ne garantias ĉiun detalon ĉar mi rakontas de memoro; sed tiel bone la priskribo montras la metodon kion oni uzas por altigi domojn ke la legantaro certe min pardonos, se mi penos skribi pri ĝi tion kion mi memoras.

Unue oni formovis kelkajn ŝtonojn kaj por ili anstataŭigis trabojn. Nature oni formovis ĉiujn la ŝtonojn el la sama vico, kaj oni zorgis ne formovi sufiĉon da ili por malfortigi la konstruaĵon. Kiam oni estas anstataŭ ŝtonoj anstataŭiginta trabojn oni el la sama vico formovis aliajn ŝtonojn, ankaŭ anstataŭiganta ilin per traboj; kaj tiamaniere oni daŭrigis ĝis kiam la tuta konstruaĵo restis kvazaŭ sur fortega ligna kadro. Kompreneble oni formovis la ŝtonojn samtempe el multaj lokoj sur la sama viĉo. Sub tiu kadregoj oni metis aregon de turnleviloj, kaj ĉe ĉiu turnlevilo starigis homon, kiu, ĉe donita signo imete turnigis la tenilon. Oni tre zorgis ke ĉiu el ili turnu ĝuste la saman spacon ĉe la sama momento, kaj ĉe ĉiu movo oni altevis la konstruaĵon, mi supozas, nur malgrandan porcion da colo.

Tuj kiam oni estis levinta la kadregon sufiĉon da spaco por tion permesi aliaj laboristoj konstruis sub ĝi unu tavolon de dikega kaj fortega muro. Pro tio, neniam estas granda interspaco inter la konstruaĵo kaj la subkonstruaĵo. Fine, mi supozas, oni formovis la trabojn malmaniere kiel oni unue ilin enmetis en la muron. Dum la tuta altigo gastoj manĝis kaj dormis en la hotelo kaj, oni diras, ne sentis eĉ la plej malgrandan skueton.

Tie ĉi mi intencis ion diri pri la hoteloj, sed tiu estas afero tro longa por esti traktata en la fino de fragmento. Mi tial anstataŭigos por ĝi priskribon de Dioservo kiu lasis sur mia cerbo profundegan impreson. Pri la hoteloj mi esperas paroli en la proksima fragmento.

Ĝis nun mi ne parolis de mia akompanantino dum la pli granda porcio de mia vojaĝo. Permesu ke mi nun prezentu al la legantaro—mian onklinon.

Ho! tiu dimanĉo; kiel ĝi estis varmega! Apenaŭ oni povis spiri, kaj en niajn manojn mi certe atendis vidi kelkajn ventumilojn, sed tion kion mi vidis mi tute ne atendis, eĉ ne povis atendi.

En la tuta preĝejo (kaj ĝi estis tre granda konstruaĵo) mi kreas ke la onklino kaj mi mem estis la solaj personoj kiuj ne portis ventumilon.

Eble oni devas ankaŭ ekcepti la organiston, sed nur dum la tempo mem kiam li ludis la organon, kaj mi ne estas certa ke iu ne ventumis lin dum la ludado.

Ho! tiuj maltrankvilaj, maltrankviligaj ventumiloj! Ĉie en la preĝbenkoj oni svingetis ilin; ĉiu ĥorano kaj ĥoranino svingetis ilin; dum la kantado oni svingetis ilin; dum la preĝoj oni ankoraŭ ilin svingetis; oni ilin svingetis dum la legado de la Sankta Biblio, kaj, kiam fine la predikisto supreniris la tribunon por prediki, li ankaŭ portis ventumilon kaj sin ventumadis per ĝi dum la tuta predikado.

La komenco de la prediko mi aŭdis tiamaniere:

“Miaj karaj” (*ventum*—li svingis la ventumilon dekstren) “fratoj” (*ilo*: ventumilon maldekstren).

“Mi parolos al vi” (*ventum*—) “hodiaŭ pri la” (*ilo*) “vortoj kiujn vi” (*ventum*—) trovos en la (*ilo*), k.t.p.

Aŭskulti mi ne povis. Malgraŭ la volo miaj okuloj postsekvadis la movojn de tiuj diversaj ventumiloj, kaj preskaŭ mi fariĝis strabulo per mia prenado por vidi ĉiujn el ili samtempe.

Ekkaptis min freneza deziro ke oni svingu ilin ĉiu ĉe la sama momento laŭ la sama direkto. Mi ne povis ne rigardi, mi ne povis fermi la okulojn. Mi estis hipnotigita per ili, kaj bonege mi komprenis la koron de tiu fama violonisto kiu subite ĉesis ludi sian amatan muzikilon, kaj alveninta al la antaŭa flanko de la estrado tiamaniere parolis al riĉe vestita sinjorino, kiu sidis en la unua vico de la aŭskultejoj kaj trankvile ventumadis sin: “Sinjorino, sinjorino: kiamaniere mi povas ludi la violonon en tempo  $\frac{3}{2}$ , se vi persistas vin ventumi en tempo  $\frac{3}{4}$ ?”

En tiu preĝejo oni sin ventumadis en ĉiuj la tempoj. Pri unu afero mi estas nepre decidinta. Se ankoraŭ mi ĉeestos tian Dioservon, mi mem kunprenos ventumilon.

## UNIVERSALA KONGRESO EN BOULOGNE (Aŭgusto 5—13, 1905).

Dum la 1<sup>a</sup> *Universala Kongreso de Esperanto*, kiu okazos proksiman Aŭguston, sub la prezido de D<sup>ro</sup> L. Zamenhof, en Boulogne-sur-Mer, estos organizataj vesperkunvenoj kiuj konsistos precipe el *balo kaj koncertoj*.

Estas de nun necese prepari tiujn kunvenojn por ke ili havu kiel eble plej grandan sukceson. Ni ne dubas ke se ni atingas tiun celon, ni estos incitintaj la kuriozecon de la skeptikuloj kaj de la indiferentuloj kiuj nepre estos tiam esperantistigotaj. Tial, tiuj festoj devas esti zorge pripensataj kaj de longe organizataj.

*Balo*.—Laŭ la opinio de kelkaj Kongresantoj, ni pensis ke estus bone ke en la balo partoprenu multaj fremduloj kun naciaj aŭ regionaj vestaĵoj. Tiu balo estus tiel originala festo kiu elmontrus tute bone la diversecon de la nacioj reprezentataj en la Kongreso; plie, kaj precipe, la interkompreno per Esperanto estus pli konstatebla kaj farus gravan impreson sur la granda amaso da libertempuloj kaj da turistoj kiuj ĉiujare vizitas Boulogne-sur-Mer dum Aŭgusto. La balo devas do esti fruktoplena propagandilo. Ni estas certaj ke ĉiuj gekongresantoj komprenos la gravecon de tiu kunveno kaj ni ne sciis tro insisti por ke kiel eble

plej multaj el ili skibu al ni post ne longe promesante alveni kun naciaj, regionaj kaj variaj kostumoj. Ni estos tre dankemaj al ĉiuj kiuj bonvolos aŭdi nian alvokon.

*Koncertoj*.—Alia grava punkto pri festoj kongresaj estas tiu kiu celas la organizadon de la koncertoj. Eble okazos almenaŭ du koncertoj, nur esperantistaj kompreneble. Ĉar ilia sukceso postulas ke la partoprenantoj estu diverslingvaj, por pruvi ke Esperanto estas same elparolata en ĉiuj nacioj, ni petas ĉiujn kiuj povas kanti, deklami aŭ ludi muzikilon ke ili bonvolu:

1° Sendi al ni la tekstojn de la verkoj kiujn ili intencus prezenti;

2° Sciigi al ni kiujn tagojn ili nepre estos en Boulogne-sur-Mer.

La solvoj de tiuj demandoj tre helpus la formadon de niaj programoj. *Multegaj estu la respondoj!*

Ni esperas ke tiu ĉi alvoko nia estos aŭdata en la esperantistaro kiu venos al Kongreso kaj ni sciigas ke ni dezirus ricevi, kiel eble plej baldaŭ, la respondojn kiuj estos adresataj al: *S<sup>ro</sup> Paul Boulet, Vicsekretario de la Grupo Esperantista, 49, Strato Louis-Duflos, Boulogne-sur-Mer (France)*.

## LA KVAR HENRIKOJ.

Rakonto de Frédéric Soulié.—Esperantigis A. Motteau.

Oni diras ke, foje, en vespero kiam torente pluvo falis, maljunulino, kiun ŝiaj najbaroj pensis esti sorĉistino, kaj kiu loĝis en malriĉa terdometo meze de la arbaro S<sup>ta</sup> Germano, aŭdis frapadon ĉe la pordo: ŝi ĝin malfermis, kaj ekvidis rajdanton kiu petis por gastigo. Ŝi kondukis lian ĉevalon en garbejon kaj envenigis lin kun ŝi. Per lumo de fumiga lampo ŝi juĝis ke li estis juna nobelo: la figuro elmontris junecon, la vestaĵo nobelecon. La maljunulino ekbruligis fajron, kaj demandis “Ĉu la sinjoro deziras ion por manĝi?” Deksesjara apetito, tute kiel samaĝa koro, estas tre avida kaj ne tro elektema: tial, la junulo akceptis porcion da fromaĝo kaj pano, eltiritan de pankesto, el kiu konsistis la tuta provizo de la maljunulino. “Mi havas nenion krom tion,” diris ŝi al la juna nobelo, “dekona, reĝa, sala, helpa, kaj ceteraj impostoj nur tion lasas al mi por prezenti al malriĉaj vojirantoj;—plue, la ĉirkaŭaj malĝentiluloj diras ke mi estas sorĉistino dediĉita al la diablo, kaj tute konsciencie kaj senpune ŝtelas la produktaĵon de mia kampo.”

“Pardi,” diris la juna nobelo, “se mi iam fariĝos reĝo de Francujo, mi neniigos impostojn kaj edukigos la popolon.”

“Dio vin aŭdu!” respondis la maljunulino.

La junulo alproksimiĝis la tablon por manĝi, sed tuj alia frapo al pordo haltigis lin. La maljunulino malfermis la pordon kaj ankoraŭ ŝi vidis rajdanton akvumitan je pluvego, kaj li simile petis por gastigo. Ŝi konsentis ricevi lin, kaj kiam li envenis, li estis, kiel la unua, junulo kaj nobelo.

“Ĉu estas vi, Henriko?” diris unu.

“Jes, Henriko,” respondis la alia.

Ĉiu el ili nomiĝis Henriko. La maljunulino sciigis, je ilia interparolado, ke ili partoprenis en multenombra ĉasanaro, kondukita de Reĝo Karlo IXa, kies anojn ĵus disigis la pluvega fulmotondro.

“Ĉu, maljunulino,” diris la dua, “vi ne havas ion ajn, krom tion, por doni al mi?”

“Nenion,” ŝi respondis.

“Ni do devos kunpartigi.”

Ĉe tio, la unua Henriko malplezure grimacis; sed rigardinte la decidan okulon kaj la muskolan belkreskon de la dua Henriko, li diris ĉagrene: “Kunpartigu ni do.”

La jena priprenso, kvankam ĝin li ne esprimis, estis komprenita post tiuj vortoj: “Kunpartigu ni (pro timo ke li prenis la tuton).”

Sekve, ili sidigis unu kontraŭ la alia, kaj la unua jam pretigis ektranci la panon per ponardo, kiam subite trian frapon oni aŭdis ĉe la pordo. Stranga renkonto! alia junulo, alia nobelo, alia Henriko

aperis. Tre mire la maljunulino ilin rigardis. La unua atencis kaŝi la fromaĝon kaj panon, sed la dua ilin remetis sur la tablon, kun lia glavo apude. La tria Henriko ridetis, dirante: “Se vi ne volos doni al mi iom el via noktomango, mi povos atendi: mi posedas fortikan stomakon.” “La noktomango,” diris la unua Henriko, “rajte apartenas al la unua veninto.”

“La noktomango,” diris la dua, “apartenos al tiu, kiu plej brave povos ĝin gardi.” La tria Henriko kolere ekrugiĝis, fiere dirante: “Eble ĝi apartenos al tiu, kiu plej brave ĝin kaptos.”

Apenaŭ li estis dirinta tiujn vortojn, kiam la unua Henriko eltiris sian ponardon, kaj la du aliaj siajn glavojn. Ĵus kiam ili pretigis por batigo, kvara junulo, kvara nobelo, kvara Henriko estis enkondukita. Vidante glavojn eltiritajn, li sian eltiris, sin lokis apud la malplej forta, kaj tuj atakis sendistinge.

La maljunulino sin kaŝis timigitan, kaj la glavoj frapis, rompegante ĉion, kion ili renkontis. La lampo falis, estingigis, kaj ĉiu el ili daŭrigis frapi en la mallumo. Dum kelka tempo, la bruo de la glavoj daŭris, kaj grade malpliigis, kaj fine ĉesis.

Tiam la maljunulino riskiĝis eliri de ŝia kaŝejo, relumigis la lampon kaj ekvidis la kvar junulojn sur planko streĉitajn: ĉiu el ili estis vundita. Ŝi ekzamenis ilin: laciĝo pli ol sangperdo ilin faligis. Ili sin levis unu post alia, kaj hontintaj je tio, kion ili ĵus faris, ili ridetante interdiris: “Nu! ni noktomanĝu konsenteme kaj pace.”

Sed kiam li serĉadis por trovi la manĝado, ĝi tiam estis premegita sub piedoj, kaj malpurigita per sango kaj koto. Kvankam mizera manĝaĵo, ili bedaŭris ĝian detruigon. Aliflanke la malriĉa ĉambreto estis ruinigita, kaj la maljunulino sidis en angulo rigardante per sovaĝaj okuloj la kvar junulojn. “Kial ci rigardas nin tiamaniere?” diris la unua Henriko, kiu sentis sin malkvietigi sub tia rigardo. “Mi rigardas viajn sortojn skribitajn sur viaj fruntoj,” respondis la maljunulino.

La dua Henriko severe ordonis ke ŝi tuj diru, la du aliaj ridante petis ke ŝi klarigu sian diron.

La maljunulino diris: “Kiel vi kune ĉeestas en tiu ĉi dometo, vi kvarope havos saman sorton. Kiel vi premegis kaj makulis, per piedoj kaj koto, panon kiun mi gastame oferis al vi, tiel vi premegos kaj makulos povon, en kiu vi amike povus partopreni. Kiel vi ĵus ruinigis tiun malriĉan dometon, tiel vi malriĉigos kaj ĉagrenigos Francujon. Kiel vi kvarope estis vunditaj en la mallumo, tiel vi kvarope pereos per perfidaĵo kaj mortigo!

La kvar junaj nobeloj apenaŭ povis sin deteni moki la antaŭdirojn de la maljunulino.

La kvar Henrikoj fariĝis ĉefaj personoj en la Ligo: du estis li gestroj, du kontraŭbatalantoj de la Ligo.

Henriko de Condé, kiun lia edzino venenis en St.-Jean-d'Angély;

Henriko de Guise, mortigita en Blois, de la Kvardekvinuloj;

Henriko de Valois (Henriko IIIa), mortigita en St. Cloud, de Jacques Clément;

Henriko de Bourbon (Henriko IVa), mortigita en Parizo, de Ravallac.

## ORIENTAJ NOTOJ, de 10532.

Mia deĵoro okazis en Hindujo kaj Birmanujo: kaj, kvankam tie mi tre kontente ĝuis vivadon dum mia pli junaj tagoj, kiam mi povis toleri la varmegecon, kaj ĝui la ĉason libertempan, mi certe estas tre ĝoja fine reveni hejmen, forta kaj sana. Tiu ĉi, mi kredas, estas ja la sento de ĉiuj, kiuj restadis multe da jaroj eksterlande. Vere, ne estas ia loko simila al nia hejmo; kaj neniu pravas la senton krom tiuj loĝantaj malproksime de sia patrujo.

Certe, kalkaj homoj, pro iaj hejmaj kaŭzoj, elektas loĝi en sia memalprenita lando: sed, ĉe la plimulto, la patrujamo estas tro forta por esti neigata.

Plue, cirkonstancoj Hindaj estas multe ŝanĝitaj dum la pasintaj tridek jaroj: estas unu el la sekvoj de Angla okupo; kaj la bedaŭrindaj ideoj pri malŝparo kaj lukso igas la landon ĉiujare pli multekostan por vivado. La kosto de luprezo, geservistoj, ĉevaloj, kaj nutraĵoj plimultiĝis rapide, kaj nune duobligas, rilate al la tempo kiam Hindujo estis vera paradizo por malriĉaj sub-oficiroj, kaj junaj negocistoj.

Sociale, ankaŭ, la lando estas malpli vivebla, kaj pro tiu ĉi kaŭzo:—Antaŭ generacio, la vojaĝo al "Calcutta" okupis tridek kvin tagojn, kaj iafoje pli; sed, nune, oni povas atingi "Bombay" la dekunan tagon post foriro de "Charing Cross," dank' al rapidaj vagonaroj kaj vaporŝipoj.

Sekvas, ke homoj, anstataŭ loĝigi hejme, nur ekzistas kvazaŭ en purgatorio pro siaj kulpoj, havante inteligentecon, sed ne havante riĉecon. Kompreneble, plua kaŭzo estas la malplikarigo je la arĝentvaloro, kaj sekve la malpliiginta aĉetpovo de la "rupee"; eĉ supozante ke la nuna artefiksita rilata proporcio, nome  $R15 = £1$ , estos konstanta, la diferenco inter  $R15 = £1$ , kaj la antaŭa proporcio da  $R10 = £1$ , estas gravega. Aliediri, postulas  $R1,500$  por ricevi  $£100$ , anstataŭ nur  $R1,000$ .

Tial, oni malpli da mono elspezas je socialaj amuzajoj por tiom pli elspezi hejmen. Tre saĝe, sendube; tamen, la efekte ĉe sociala vivado en nuna Hindujo estas efektive sentebla.

Ni ĉiuj ja fariĝas pli kaj pli memcentrigitaj jare, kaj pli sentemaj pri niaj personaj aferoj kaj komfortoj, ol nia devo rilate al niaj najbaroj, kaj al nia patrujo.

Eble, estus dece akcepti lecionon de nuna Japanujo. Kelkaj jaroj estas pasintaj de la tempo kiam mi vizitis Japanujon por resaniĝi: tamen, mi ĉiam rememoros la belecon de la pejzaĝo, kaj plie, ĝentilecon de la popolo.

Forirante de "Rangoon" la ĉefurbo de Birmanujo, ni pasis tra "Penang," "Singapore," "Saigon" (en Franca "Cochin-Chine"), "Hongkong," kaj "Shanghai": ni ultime alvenis al "Kobe" (en la "Inland-Sea" de Japanujo) la unuan de Novembro. BIRMANUJO produktas tre grandajn provizojn da rizo, "Teak"\* (malmolega ligno), oleo minerala, k.t.p. La tektonaj arboj estas tranĉataj malproksime el arbaroj; lasataj kie ili kuŝas dum tri jaroj por sekigi ĝis floseblaj; tiam tirataj per instruitaj elefantoj ĝis riveroj; stampataj je la bienulaj signoj; flosigitaj sur riveroj al impost-stacioj apud havenoj; kolektataj laŭ tiuj signoj por vendi: mandatoj estas eldonataj, sur kiuj Bankieroj pruntodonas monon.

La elefanta inteligenteco estas tre interesa: ili povas altlevi ŝtupojn de pezo da 2,500 funtoj per la rostro: ili scias aranĝi ŝtupojn laŭ buŝaj ordenoj sur tero horizontale, kaj vertikale, uzante rostron, frunton, kaj sian pezegon kaj fortecon kun mirinda inteligenteco; ili ankaŭ scias akurate kie trovi ĝustan balancon, kaj kiamaniere eviti barojn.

La ŝtelo de bestoj tiel grandegaj kiel elefantoj eble ne ŝajnas facila: tamen, tio iafoje okazas, kaj la sekva ĉaso estas ofte ekscitanta kaj eĉ danga.

\* *Tectona grandis*.

## TRI VERDAJ KORNOJ.

Originale verkita de Esp. 10549 (N.Z.).

Antaŭ multaj jaroj, dum miaj tagoj de juneco, mi iris en Kanadon, kaj tie mi lernis la termezuran arton en la vastaj regionoj kiuj kuŝas inter la grandaj lagoj kaj Hudson'a Golfo. Mi foriris de Ottawa, alliginta al aro da pioniroj de la transkontinenta fervojo, kaj ni vagadis longe, tre longe preter la tiamaj randoj de civilizacio en la malproksima senlima arbarego. La vetero estis varmega, ĉar, kvankam la Kanada somero estas mallonga, ĝi estas varmega.

Unu tielan varman tagon, mi kune kun alia junulo, marŝis tra mallarĝa aleo tranĉita de la inĝenieroj tra la arbaro. Tiu aleo estis nomata ĉe ni "la linio," kaj ĝi estis la linio de la projektata fervojo. Ni returnis post kelka laboro sur la linio, al nia tendaro, kiu starigis ĉe riverbordo. La aero fariĝis pli kaj pli varma, kaj, ĉar ni estis matenmangintaj peklaĵojn, ni treege soifis. Neniam mi estis tiel dolore soifinta. La linio trakuris tra seka lando, kaj nenie ni trovis akvon. Post kelkaj horoj la turmento estante netolerebla, ni haltis, memorante ke estas Kanada arbo (betulo blanka, se mi ne nun forgesas), kies trunko haketata ellasas sukon trinkeblan kaj sensoifigan. Ni tranĉetis kelkajn arbojn, sed ricevis nur malmultajn gutetojn, kiuj estis tute sentilaj. Dum ni tiel suferadis, unu el niaj esploristoj pasis. Li estis Skoto, kiu dum la pluparto de sia vivado, kutimiĝis vagadi en la arbaregoj Amerikaj, kaj kiu estis preskaŭ tiel lerta kiel sovaĝulo pri la naturaj fenomenoj.

Por tia viro, ĉio, ĉiam, ĉie estas kvazaŭ libro malfermata. Suno, steloj, musko sur arbo, branĉo rompita, branĉeto fleksita, herbo piedpremita, tero dekliveta, ĉio estas netrompa montrilo per kies gvido li marŝas ĉien, laŭvole, senŝancele, kaj nepre trafas sian celon.

Tia viro estis Cameron, nia esploristo. Li eksciigis pri nia mizera stato, kaj diris ke oni ne eltiras sukon dum tiu monato. Tiam, vigne ĉirkaŭenrigardinte, li montris per la mano rektangle flanken, kaj diris ke ni, irante laŭ tiu direkto, trovos akvon. Ni tiam proponis fari "vojeton flamigitan" (blazed track) al la akvo, por ke ni povu reveni al la linio.

Por fari vojeton flamigitan, oni marŝante senŝeligas la arbojn per oftaj tranĉetoj de hakileto, tiel aperigante striojn de la blanka subŝela ligno. La blankaj strioj, longaj pli ol decimetro, facile distingigas sur la malpalaj trunkoj, kaj kiam vidataj de kelka interspaco, prezentas imagan similecon al flamoj, kaj pro tio, oni diras "arboj flamigitaj." Returnante, oni sin gvidas per la

blankaj signoj, tiamaniere trapasante facile kaj senerare tra la arbaro.

Tiam rimedon ni do proponis uzi por ke ni ne perdiĝu, ĉar ni ne estis ankoraŭ spertaj arbaranoj. Sed la esploristo diris ke tiel agi ne estis necese. "Post tiam, kiam vi trovos akvon," li diris, "daŭrigu marŝi laŭ tiu sama direkto. kaj vi aliros al la tendaro. De tie ĉi ĝis la tendaro, la rekta trauro nur estas du mejloj. Tenadu ĉiam la sunon super la maldekstra ŝultro, kaj vi nepre trafos la riverbordon."

Tiu ĉi konsilon ni decidis sekvi, ĉar la iro al la tendaro laŭ la mezurita linio kaj poste laŭ la riverbordo, estis du flankoj de triangulo, sed la rekta iro estus la tria kaj plejmallonga flanko.

Tial ni du junuloj konfideme eniris la profundan senvojan arbaregon, kaj post kelka tempo, ni trafis lageton. Sed, ho ve! ĝi estis kastora lageto. Ĝis tiu tago mi neniam estis trinkinta kastoran akvon, kaj mi fervore preĝas ke mi neniam regustumu tian abomenan fluidaĵon. Ne estus eble trinki ĝin escepte se oni duonmortus pro soifo. Tamen ni trinkis multe, senĉese mallaŭdante la kastorojn kaj ĉiujn iliajn farojn. La digo estis tute proksima, sed ni ne vidis la bestojn. Sendube ili estis tie, sed la pekuletoj estis tro ruzaĵ por sin montri. Se ni estis vidintaj ilin, ni eble estus estintaj iom malĝentilaj. Ugh! la akvo ja estis naŭza. Tamen ĝi forpelis la turmentan soifon, kaj tiam ni daŭrigis la antaŭeniradon, tenante la sunon super maldekstra ŝultro. Sed malfeliĉe, ni ne povis ĉiam marŝi rekte. Kelkafoje la tero estis tiel marĉa ke oni ne povis surpaŝi, kelkafoje la kreskaĵo estis densa kaj nepenetrebla, sekve ni estis devigataj ĉirkaŭiri, kaj tio nin iom konfuzis. Nekutimiĝintaj vagi tra senvoja arbaro, ni suferis iluzion de kurbiro. Rezonante ni bone sciis ke kurbiro ne estis ebla dum ni tenadis la sunon super maldekstra ŝultro, tamen, spite bona rezonado, ni ne povis forpeli maltrankvilan sentadon ke ni eraris kaj marŝis kurbe, anstataŭ rekte al la rivero. Multafoje ni haltis kaj pripensis. Multafoje ni supreniris monteton por ĉirkaŭenrigardi, sed ni nur vidis arbojn, arbojn, ĉie, ĉiam, senfinan etendecon da nekalkuleblaj arboj. Nenie estis vidata rivero, nenie tendaro. Tiamaniere nia progreso fariĝis tiel malrapida ke multa tempo pasis, kaj la suno alproksimiĝis al sia subiro. Sekve ni ektimis ke ni baldaŭ perdus nian solan gvidiston. Jam de kelka tempo ni tenis la sunon iom malantaŭ, anstataŭ super la maldekstra ŝultro, kalkulante ĝian ŝanĝitan pozicion sur la ĉielo. Ni sufiĉe komprenis ke ni devis tiel fari. Sed nun ni renkontis novan



kontraŭaĵon. Ni eniris regionon ondolinian. Kiam ajn ni malsupreniris en valeton, la suno malaperis, kaj poste, suprenrampinte la kontraŭan altaĵon, ni ĉagrenis sciigante ke ni eraris flanken. Pli kaj pli ni timis ke ni iel trompigis kaj perdiĝis. Fine la suno subiris kaj ni preskaŭ malesperis. Kion nun fari? Ni tute nesciis. Ni timegis. Dum mi staris tie senmove, mia kunulo meĥanike kaj sencele suprenrampis altaĵeton kaj tuj kriis ĝoje, "Bonege! ni estas alvenintaj! hura!" Mi sekvis lin rapide, kaj vidis viron kiu staris malsupre en valetu. Li estis unu el la junaj termurzistoj.

"Ni ĝoje vin vidas!" ni ekkriis. "Ni preskaŭ malesperis. Ni perdiĝis. Kie do estas la tendaro?"

La junulo nin rigardegis kun mirantaj okuloj.

"Kion vi diras?" li respondis.

"Mi ankaŭ perdiĝis. Mi esperis ke vi venis min serĉi. Ni do estas tri kompatindaj perdituloj!"

"De kie vi venis?" ni demandis.

"De la linio," li diris. "Mi penis trafi la tendaron, sed ne povis. Mi tute ne scias kie mi estas."

Ni tri staris silente, rigardante konsternite unu la alian. Post la subita ĝoja espero, tia neatendita repuŝo estis tre kruela bato. Ni jam estis tre lacaj, malsataj, preskaŭ senesperaj, kaj kompreneble ni havis tre malgrandan deziron por daŭrigi la marŝadon sen la gvida suno. Sed kion fari? Pasigi la nokton tie, sen manĝaĵo, sen lito, sen ŝirmilo? Por manĝaĵo, oni vidas kelkafoje perdrikojn, sed kelkafoje oni ne vidas. Ni ne vidis. Ni povis ekbruligi fajron, sed eble pluvo falus dum la nokto. Malagrabla antaŭsento! Danĝero? Ne multe. En tiu regiono de Kanadlando la enlanduloj (Iroquois) estas amikemaj, kaj ili estus al ni tre bonvenaj gvidantoj. La bestoj sovaĝaj ne estas tre timindaj, sed la malsato,—la kuloj! Certe ni ne povas dormi en tiu ĉi valetu. Ni tial multe pripensas kaj diskutas. Se ni alvokos helpon,—kriegas, ĉiuj kune, eble oni nin aŭdos? Ni do krias, tri plendaj voĉoj kune, laŭte, laŭtege krias. Tiam ni aŭskultas. Neniu respondas. Ree, kaj ree, kaj ree ni kriegas kaj pli atente aŭskultas. Nur la kula zumado mokas nin. Ni havas poŝpafilon. Ni pafas kaj longe atendas. Nenia responda eksplodsono. Ni pafas multfoje. Vane, sene-

spere vane. Ni aŭdas nur la venton en la branĉaro kaj la malbenitajn kulojn. Certe ni multege forestas de la tendaro! Ni do estas tute perdataj! Ni estas kvazaŭ en malliberejo, ĉar ni ne povas eliri nesciante laŭ kiu direkto eliri. Ni devas resti tie ĉi.

La terura senhoma soleco fariĝas subpremege kaj nervpereiga. Ĉu ni nenion plu povas fari? Ni estas en tre malgranda valetu, kies kruta flanko havas nur kelkajn metrojn da alto. Dronante ekprenas pajleron. Mi diras, "Suprenbaraktu ni sur tiun altaĵeton, kaj tiam, se ni nenion vidos, ni atendos tie ĝis la serĉantoj nin trovos morgaŭ."

"Estus senutile," respondas unu kunulo, "ĉar se ni estus sufiĉe proksimaj por vidi la tendaron, oni nin estus aŭdinta."

"Estas vere," diras la alia, "tamen ni provu tiun ĉi solan rimedon. Post tio, ni ĉesigos vanan penadon."

Lacaj, konfuzaj, apatiaj, ni dolore suprenrampas kaj senespere ekrigardetas.

Miro! Mirego! Miraklo! Ni preskaŭ timas iajn sorĉojn. Jen la rivero, jen la tendaro, tute proksimaj, tiel proksimegaj ke se ni, anstataŭ pafi, estus jetintaj la pafilon super la altaĵo, ĝi estus falinta inter la tendoj kaj eble sur ian virkapon!

Forgesante lacecon ni kuregas malsupren kriegante frenezege. Kelkaj homoj demandas kial ni faras malbenitan bruegadon.

"Ni estis perdiĝintaj," ni respondas. "Ĉu vi ne aŭdis nian kriadon?"

"Ho, jes," ili diras, "ni supozis ke vi kriis unu al alia."

"Ĉu vi ne aŭdis pafadon?"

"Kompreneble, sed ni pensis ke vi pafis al la perdrikoj."

Ni penas klarigi la veron. Ni parolas elokvente pri nia mizera malespero, sed ili apenaŭ kredas. Tiaj viroj, kiuj de longe loĝadas en la arbarego, malfacile komprenas ke estas eble perdiĝi apud la riverbordo kaj eĉ preskaŭ ĉe la tendaro. Ili ne kompatis nin, sed ridante diris ke ni estis "verdaj kornoj" (greenhorns), esprimo Amerika kiu signifas "nespertaj nesciuloj." Sed laŭ mia opinio, ni similigis al savatuloj el ŝipperoo, aŭ al forkurintoj el malliberejo. Ni jam estis dankaj, felicaj, trankvilaj, sed iom pli malfrue ni estis ankoraŭ pli kontentaj, ĉar—kredu al mi, kara epikurista leganto—oni ja avide, apetite vespermanĝas en la vasta Kanada arbaro.

La prezidanto de la Grupo Esperantista Pariza informas nin, ke la membroj de la nomita grupo kunvenas ĉiumerkrede, je la naŭa vespere en "Café de la Rotonde," 36bis, Boulevard Haussmann, kaj ĉiuvendrede, je la deka vespere, en "Café Soufflet," 25, Boulevard St. Michel, en rizervitaj salonoj.

Nur Esperanto estas uzata en tiuj kunvenoj, kaj la fremdaj geesperantistoj ĉiam estas akceptataj kiel eble plej afable.

## LA IDEOJ DE FRAŬLO PRI AĈETADO!

Originale verkita de 9911.

Du aŭ trifoje, antaŭ ne longe, mi akompanis mian fratinton kiam ŝi aĉetadis. Estis tial ke mi estis estinta tre bona knabo, mi supozas. Kompreneble, mi devis esti ĝuinta min mem troe, sed iel mi ne povis. Kelkfoje mi oferis mian konsilon pri io, kelkfoje mia fratino efektive petis ĝin; sed neniam ŝi agis laŭ ĝi! Mi ofte rimarkis ke la fratinoj de miaj amikoj ŝatas kaj taksas mian konsilon pli bone ol mia propra fratino, kvankam mi tute ne scias kial! Nu, mi scias ke mia fratino (malfeliĉe por ŝi) ne jam povas legi Esperante, tial mi skribos miajn konsilojn pri aĉetado, en Esperanto, por ke miaj amikinoj en la nobla Esperantistaro povu profiti per ili! Mia fratino diras ĉiam ke nura fraŭlo scias nenion pri la arto de aĉetado; sed miaj amikinoj (se nur pro sciameco!) sendube legos kion mi opinias pri tiu certe virinseksa okupado. Ŝajnas al mi ke estas tri punktoj kiuj meritas la atenton de ĉiuj aĉetadontoj.

Unue, oni devas scii ĝuste tion, kion oni bezonas. Due, oni devas tion ricevi; kaj trie, oni certe devas pagi tiel malmulte kiel eble por ĝi! Nu, mi ofte rimarkis ke miaj amikinoj ĝenerale ne scias kion ili vere bezonas, kaj tial ili subfalis kompatinde sub la logaĵoj kaj ruzoj de la butik-helpantino, kiu estas ofte beleta, kaj havis ja langon el mielo! Sinjorino aĉetadante certe devas ricevi kion ŝi bezonas, sed tre ofte ŝi ne ricevas tion! La afero de la helpantino estas vendi, ne tion kion la kliento deziras, sed kion ŝia mastrino volas vendigi. Ofte oni povas vidi sian amikinton sur la strato ekster butikoj, tenantan multe da pakajetoj da objektoj kiujn ŝi tute ne bezonas! Ho, jes! sed mi tion ofte vidis, kaj kelkfoje ŝi eĉ konfesos ke la helpantino estas estinta tro lerta poduone!

Ankaŭ, sinjorino aĉetadanta devas pagi tiel mal-

multe kiel eble. Kaj kompreneble mi signifas, ne necese tre etan prezon, sed bonan valoron por la mono.

Nu, la arto de aĉetado estas reale ludo, en kiu la lerteco de unu fraŭlino baraktadas kontraŭ la lerteco de alia; kaj esceptinte ke la aĉetantino scias iom pri la ruzoj de la vendistino, la dua certe venkos, tial ke la dua ludas ludon kio estas sia vivilo, kaj per kio ŝi gajnas panon kaj buteron, kaj la unua nur estas nemetiistino.

Unu ruzo de la vendisto estas oferi ian etan komercan eton (ekzemple, gantojn, sunombreton), po kosta prezo (t.e., senprofite), aŭ eĉ po malpli ol tio, por doni impreson de malkareco. La kliento poste volas spekulacii je aliaj komercaĵoj kiuj vendiĝas po tre granda profito. Tia metodo estas kompreneble nur kiel reklamo, kaj la vendisto atendas ke la sinjorino aĉetos ĉion kion ŝi bezonas en lia butikoj estonte.

Nu, la sinjorino kiu klopodos akiri tian informon per zorga observado, kaj kiu agos laŭe atingos sian rekompencan, tial ke ŝiaj amikinoj kredos ke ŝi elspezas trioble aŭ kvaroble pli ol ŝi reale elspezas je sia vestaĵoj.

Kelkaj fraŭlinoj imagas ke se ili aĉetas kelkfoje en tre multekosta butikoj, certe ili akiros ion tre, tre bonan. Kompreneble tia butikego ne ŝatas tian okazan klienton, kaj la kliento sekve ofte forvenas tute malkontente. Anstataŭ tio, ŝi devas klopodi eltrovi kiam la ĉef-helpantino de granda firmo estas komerconta por si mem, tiam la nova vendistino klopodos multe por sia antaŭa kliento kaj la kontentigo estas reciproka!

Nur unu pluan konsileron mi oferus. Kiam miaj amikinoj eliras por aĉetadi, certe ili devas preni kun ili ies fraton por ke li atentu tiajn etajn detalojn kia la pago de la kalkulo!

## ANKAŬ SAĜA HUNDO.

Originale verkita de N.B.

Sinjoro Smith iam havis vulptieron kiu lin ĉagrenadis kuŝante sur la plej bona seĝego en la studejo. Kiam ajn la hundo eltroviĝis sur la seĝego sia mastro lin bastis, tial fine li sur ĝi kuŝi nur kuraĝis kiam la mastro ne ĉeestis.

Unu tagon, S<sup>ro</sup> Smith, enirante en la ĉambiron vidis la hundon vere sur la planko, sed tre kulpe

mienantan; la mastro tuj alproksimiĝis al la seĝego kaj mane palpis la kusenon, kiu estas tute varma. Tial li riproĉegis kaj batis la hundon.

Morgaŭe, kiam S<sup>ro</sup> Smith malfermis la pordon li eltrovis la hundon sur ĝiaj postaj kruroj starantan, ĝiaj antaŭaj piedoj sur la sidejo, kaj ĝi blovis sur la kusenon por ĝin malvarmigi!

## ESPERANTA RONDIRANTO.

## AN ESPERANTO EVERCIRCULATOR.

By Dr. Martyn Westcott.

Rondiranto estas reale manuskripta gazeto en ĉirkaŭiro privata inter Samideanoj.

Ĝia celo estas permesi ke membroj restu reciproke intertuŝigataj, kie ajn ili estas, kaj plibonigi ilian scion de la lingvo per amika kritiko. La far-metodo estas simpla. Ses aŭ pli Esperantistoj konsentas donaci, unufoje ĉiunmonate, mallongan artikolon en aŭ pri Esperanto.

Tia verketo povas esti letero, anekdoto, plendeto, tradukaĵo, originala rakonto, poezio, sciigo pri gramatiko . . . aŭ io ajn kiu interesus la aliajn.

Artistaj membroj sendas skizojn, aliaj nur kritikojn skribas; sed ĉiu *devas* ion aldoni al la Rondiranto antaŭ li ĝin forsendos.

Oni elektas unu el la membroj kiel kondukanto, kaj li ekkomencas la gazeton kaj provizas la kovrilon, kiun oni povas oportune ricevi de Isaac Pitman, 1, Amen Corner, E.C. La kosto de tukobindita kovrilo estas unu ŝilingo, kaj la leda-bindita kostas unu ŝilingon ses pencojn, aŭ frankite. Rondiranto, sendata en kovrilo, ĉe ambaŭ finoj malfermita, vojaĝos tra la poŝto en la Insuloj Britaj po duonpenco por ĉiu du uncoj.

Ĉiu membro ricevas la gazeton laŭvice, kaj tuj kiam li ĝin estos leginta kaj kritikinta la verkaĵojn de aliaj en la spaco rezervita por tio, en ĝi li enskribas sian propran artikolon, kaj forsendos la gazeton al la membro sekvonta.

Abonkosto nur noma devas esti pagata de ĉiu membro, kiu submetiĝas je monapuno se li malobeos la regularon.

Tiuj ĉi private-ĉirkaŭirataj gazetoj ebligas lernantajn Esperantistojn praktiki por klare esprimi iliajn pensojn per stranga lingvo, kaj ili vidigas kaŝitan kaj eble nesuspektitan literaturan talenton.

La kondukanto, ricevante ree la Rondiranton, eltiras la malnovajn verkaĵojn, kunligas ilin, enmetas en la kovrilon novan verkon de si mem, kaj denove sendas ĝin vojaĝi.

Ne estas necese ke ia membro de Esperantista Grupo estu eksigata por ke li ne povu partopreni en Rondiranto; la "novulo" certe povos fari demandon pri la gramatiko eĉ se li nenion alian povas fari.

Ordinare ek-lernantoj estas terure kritikemaj!

An Evercirculator is really a manuscript magazine with a private circulation between friends-in-Esperanto.

Its aim is to enable members to keep in touch with each other, wherever they may be, and to improve their knowledge of the language by friendly criticism. The method of procedure is simple. Six or more Esperantists agree to contribute, once a month, a short paper written in or about Esperanto.

Such contribution may be a letter, an anecdote, a grumble, a translated passage, an original story, a poem, a note about grammar . . . or anything else that would interest the others.

Artistic members send sketches, others only write criticisms; but everyone *must* add something to the Evercirculator before he sends it on.

One of the members is chosen as a conductor, and he starts the magazine and furnishes the cover, which can conveniently be obtained from Isaac Pitman, 1, Amen Corner, E.C. The cloth-bound covers cost one shilling each, and the leather ones eighteupence, post free. An Evercirculator, sent in a wrapper open at both ends, will travel through the post in the British Isles at the rate of a half-penny for every two ounces.

Each member gets the magazine in turn, and when he has read it and criticised the work of others in the space provided for the purpose, he writes in it his own contribution, and sends the magazine away to the next member on the list.

A merely nominal subscription should be paid by every member, who is subject to a fine if he breaks the rules.

These privately-circulated magazines enable young Esperantists to practice the clear expression of their thoughts in a "foreign" tongue, and they bring out latent and perhaps unsuspected literary talent.

The conductor, on once more getting back the Evercirculator, takes out all the old contributions, ties them together, inserts a new one of his own into the cover, and sends it on its journey once more.

No member of an Esperantist Group need be excluded from participation in an Evercirculator; even the "new chum" is certainly able to ask a question in grammar if he can do nothing else.

As a rule, beginners are dreadfully critical!

## EL NOVA-ZELANDO.

## Al la Redaktoro.

Kara Signor' Redaktoro,  
 Estas ja al mi honoro,  
 Se vi havos la bonecon  
 Min permesi liberecon,  
 Vin sciigi per letero  
 Kiel sanas la Afero  
 Ĉe la fino de la tero.

Kvankam iom da ekanto—  
 Ne jam lerta parolanto—  
 Por ellerni la verkadon  
 Mi komencas versfaradon.  
 Malfaciloj ja aperas,  
 Tamen baldaŭ mi esperas  
 Ion skribi eldonindan  
 Se ne eble altŝatindan—  
 Kanton plenan de l' espero  
 Pro l' homaro kaj l' Afero.  
 Al vi, dume, kun rideto,  
 Venas tiu ĉi kanteto,  
 Aŭ, pli rekte, verkajeto.

Antaŭ pli ol unu jaro,  
 El Britujo, trans la maro,  
 Tien ĉi la lingvo venis ;  
 Tiun tagon ja ni benis.  
 Al la Esperantistaro  
 Sin aldonis loka aro—  
 Klopodantoj sindonemaj,  
 Reciproke tre skribemaj  
 Sud-Insule jam loĝantaj  
 Estas dek-ses Esperantaj  
 Eklernantoj aŭ skribantoj,  
 Kaj du lertaj parolantoj.  
 Nord-Insule, ĉe Aŭklando,  
 Tiel mi sciigas, bando  
 Tri-dek-forta nun kunvenas  
 Kaj la lingvon lerni penas.

Ĉi-tie pro unu pero  
 Nun suferas la Afero.  
 Disigataj kaj ne grandaj  
 Estas urboj Nov-Zelandaj ;  
 Sed en ĉiu grava loko,  
 Respondantaj al la voko,  
 Trovas sin el la urbanoj  
 Du aŭ tri samideanoj.  
 Ankaŭ tie ĉi ĝisnune,  
 De la publiko komune,  
 Nia lingvo tre-amata  
 Estas tute nekonata.  
 Kiam ĝi plikonatiĝos  
 Ĝi sendube disvastiĝos.  
 Tamen ĝi antaŭeniras  
 El mallumo nun eliras.  
 La vidaĵo pliboniĝas,  
 Kaj pli ofte nin aliĝas  
 Fervoremaj eklernantoj,  
 Novaj kundisvastigantoj.

Tiel faras ni ĉi-tie.  
 Ho ! Samideanoj ĉie,  
 Senlace do klopodadu ;  
 La devizon memoradu—  
 "Malesperu ni neniam,"  
 Ankaŭ jen—"Antaŭen Ĉiam."

Nun, sendante bondeziron,  
 Fari devas mi eliron  
 Kaj restadi, kun tut' mia  
 Koro, tre fidele via,  
 Kun saluto adiaŭa  
 Nau-mil-ses-cent-tridek-naŭa.

EDWARD YOUNG.

*Westport, N.Z.*

## APERĴO DE KORSIKUJO DE LA ITALA MARBORDO.

Insul' violkolora en la frumateno  
 Vidigas trans la blua mar' trankvila,  
 Sed baldaŭ per la vintraj nuboj iĝas nula,  
 Aŭ je someraj tagoj pro l' aer' nebula  
 Ĝi malaperas, al sonĝet' simila.

Kiom da revoj venas, ne plenumiĝotaj,  
 En la naivaj jaroj de juneco ;  
 Kaj pli malfrue la spirito vane vagas

Por kapti iluziojn kiujn ĝi imagas,  
 Trans nia lando de la estantecco.

Ĉirkaŭe staras altaj montoj ne venkitaj,  
 Profundaj valoj, sen kultur' kamparo !  
 Malofte ridas niaj fratoj, ofte ploras ;  
 Malmulte ĝojas ili, sed ve ! tro laboras ;  
 Ne revu ni pri io trans la maro.

C. BICKNELL, *originala verko.*

22. (Vol. II., No. 2.)

THE

August, 1905.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 cents).

Published by LUDWIG ZETZLER, 41, Great Tower St., London, W.C.

Laŭ Komisiondeciso akceptita de ĉiuj la DEB EDITOJL. 17, Rindögatan Svedska Språket, London, W.

## CONTENTS.

|  |     |
|--|-----|
| REDAKCIADA FOLIO VIII. (Edvard<br>Monsieŭ, M.A., D.D.)                           | 113 |
| NOTES ON THE DIRECTOR, Part II. (Ch.<br>H. K. Doolan)                            | 114 |
| ESPERANTO: TEMOj POR DISKUTI: (by<br>Vladimir (by Dr. Leger))                    | 118 |
| SONETOj A HIPPO (by Misses E.<br>Keston)   | 122 |
| A LETTER TO GOVERNMENT (translated<br>by Miss Lane)                              | 127 |
| MOVEN BY MORO  | 131 |
| LA FORTUNA DE LA ESPERANTO (E. de<br>Meilly)                                     | 137 |
| A NEW WORD: ANTO (by Thomas<br>Lanyon, by Dr. Oliver, translated)                | 141 |
| UNCOMMON WORDS (by E.W.)   | 144 |
| THE GREAT THING (E. E. Lanyon)   | 146 |
| THE YOUNG FIRMAMENT (by Miss<br>Stevenson, translated from page 98 of Esperanto) | 147 |
| A BOUNDLESS DISCOVERY (E. E. L.<br>Lanyon)                                       | 151 |
| A FURTHER ADVANTAGE (by Miss<br>Lane)  | 154 |
| THE NEW FABLE (by Lanyon)  | 158 |

MAJESTIC IMPRINT  
LONDON

## VISKO — ESPERANTO.

ESPERANTO TRAJTO HAVO, No. 250/261.

ELDONITA DE VIKTORIANO

MEMBRUJITO DE LA ESPERANTO

EN LA BAZARO DE LA

ESPERANTO EN LONDONO

EN LA BAZARO DE LA

BUCHANAN, SCOTT & CO.,

Opposite Great Britain  
Building.

SOLE AGENTS FOR THE UNITED KINGDOM

**The Remington**  
THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

And Most Excellent  
THE INTERNATIONAL MACHINE.

Published by Act of Parliament  
The Remington International Machine Company

100, Strand, London, W.C.2.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Strand, London, W.C.2.

**La Remington**  
LA UNIVERSAL ESCRIBIASINA.

Progreso de Hoy!  
LA INTERNADIA MAQUINA.

Publicada por Acto de Parlamento  
La Remington Internacional Maquina Compañia

100, Strand, London, W.C.2.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
100, Strand, London, W.C.2.

**ČILL MI POVOS  
PARADIZON IRL**

|                      |                      |
|----------------------|----------------------|
| 1000 copies printed. | The price of paper   |
| 1000 copies printed. | The price of ink     |
| 1000 copies printed. | 1000 copies printed. |
| 1000 copies printed. | 1000 copies printed. |
| 1000 copies printed. | 1000 copies printed. |

Published by the Remington International Machine Company  
100, Strand, London, W.C.2.

**The "Review of Reviews"**

is the best magazine for the "Masses" and it is read by "Esperanto" students.

The aim of the magazine is to give the best thought and the best writing and reading material available. The magazine is published monthly and is sent free to all subscribers. It is published by the Remington International Machine Company.

Post Free for Twelve Months, 5/6  
100, Strand, London, W.C.2.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY

**NASKIGO.**

At the Remington International Machine Company  
100, Strand, London, W.C.2.

**Correspondence Lessons in Esperanto**

100, Strand, London, W.C.2.  
100, Strand, London, W.C.2.

Adresaro de Personoj kun deziraĵo Korespondadi

100, Strand, London, W.C.2.

100, Strand, London, W.C.2.

# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.  
AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.  
BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtral.  
FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.  
GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.  
NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.  
RUSSIA.—Societo Espero, Bol Pođjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.  
SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelngatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.  
Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

N.B.

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.  
Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

22. [Vol. II., No. 8.]

AUGUSTO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

“Du ovojn en ŝelo, kelnero!”

La kelnero foriras kaj iomete ridante mi rakontas al la onklino kiamaniere en Francujo mi forgesis la frazon “en ŝelo” kaj laŭ la Angla frazo mendis “ovojn bolitajn” ricevante, post iom longa atendo, tre bongustan kaĉan pudingon (batter pudding). La onklino insistas ke pli kredeble ĝi estus ovoĵo, al kiu kritiko mi respondas ke mi mem mangis ĝin.

Tiam mi pripensas kiamaniere mi lernis mangi ovojn en ŝelo sen kulerlo anstataŭiganta tiun ilon per peco da pano (nature la ovoĵo devas esti apenaŭ bolitaj) kaj mi esprimas la esperon ke Amerikoj almenaŭ uzas kuleron.

Pri tio mi tuj certigas. La kelnero revenas kaj li certe alportas kuleron; li portas ankaŭ pladon surhavantan du ovojn dece en buŝtuketo enfalditajn, kaj larĝan glason kium li metas apud mia telero, sed li ne alportas ovingon.

“Ĉu vi forgesas la ovingon, kelnero?” mi demandas.

“Ovingon!” li respondas per voĉo surprizita eĉ iom plendeta, “en Amerikujo oni ne uzas ovingojn. Jen glaso kaj jen kulerlo!” Tiam vidinte ke mi ne komprenas, li aldonis, “Ĉu mi preparos por vi la ovojn?” kaj ekkaptinta unu el ili li rompis la ŝelon kaj elverŝas ĝian enhavon en la glason, dirante: “Tiamaniere oni povas ĉiam vidi ĉu la ovo estas ankoraŭ taŭga por esti mangota. Dum la varmega vetero ovoĵo rapide difektas.”

Sed malgraŭ la kelnero mi vidis en Amerikujo tre belan ovingon tute el tranĉita vitro fabrikitan. Ĉe ĉiu finiĝo estis ingo, granda ingo por granda ovo kaj negranda ingo por negrandaĵo ovoĵo. Se

oni uzis la grandan ingon la negranda fariĝis la piedestalo kaj reciproke.

La sinjorino kiu ĝin moutris al mi diris ke ĝi apartenis al ŝia pra- aŭ pra-pra-avo, kaj mi ĝojis lerni, ke kaj ŝi kaj ŝia ovingo estis el Angla deveno.

Ĉu Amerikoj posedas ovingojn mi, do, ankoraŭ nescias, sed mi preskaŭ tuj faris la gravan eltrovon ke ili ne posedas tranĉilojn.

“Kion vi diras?” ekkrias la leganto. “Ĉu Amerikoj ne eltrovis la *Bowie* tranĉilon. Ĉu ili ne estas eĉ konategaj pro siaj tranĉiloj?”

Vi diras la veron, ho! leganto, sed se vi iam sidus ĉe la tablo de Amerika hotelo vi tre bone komprenus mian diron. Tranĉilo estas ilo por tranĉi, ĉu ne? Tial, se la ilo ne konvenas por tranĉi ĝi ne estas, malgraŭ la nomo, *tranĉilo*.

Mi supozas ke la kaveganoj nomis siajn silikajn ilojn tranĉilojn, kaj se mi posedus la brakforton de kavegano eble mi donus la nomon al la Amerika stanumita ilo, ĉar tiam kredeble mi povus eĉ tranĉi viandon per ĝi. Ne, Amerikoj ne posedas tranĉilojn sed nur ilojn por esti facile purigotaj.

Mi proponas al miaj Amerikaj kunfratoj la nomon “purigotiloj.”

Oni ne bezonas longan serĉon por trovi la kaŭzon de tio ĉi. Mi ĝin diros per tre malmultaj vortoj. *En Amerikujo ne estas servistoj sed nur tiranoj kiuj sin nomas servistoj.* Pli ĝuste diri ili nomas sin almenaŭ ĉe la domoj, “helpantoj.” “*Lucus a non lucendo.*” Kiel ofte mi estas aŭdinta de diversaj sinjorinoj ke ili estaj grandaj malhelpuloj.

Mi donos unu ekzemplon de la Amerika servitudo al la servistoj; antaŭe dirante ke kvankam ĉio kion mi priskribos estas vera ĝi tamen ne estas vera por ĉiuj hoteloj. Mi vizitis hotelojn de multaj klasoj kaj en multaj urboj, kelkajn kune kun la onklino, kelkajn sola. Nature mi plej rimarkis tion kio ŝajnis al mi stranga.

En kelkaj hoteloj la kelneroj insistas, ke la gasto mendu samtempe ĉion kion li intencas manĝi. Ĉiujn la manĝaĵojn la kelnero alportas samtempe kaj arangas ilin sur multego de negrandaj pladoj en duonrondo, ĉirkaŭ la telero de la manĝanto, kiu sidas kvazaŭ post rampareto de pladetoj, kaj ofte prenas sur sian teleron la plej strangan miksaĵon.

Mi aŭdis ke Anglo, nesciante la kutimon, mendis ion alian post kelkaj minutoj de manĝado. "Tiu ĉi fojon," diris la kelnero, "ĉar vi estas fremdulo, mi ĝin alportos al vi, sed atentu vi ke tio ne okazos."

En kelkaj hoteloj estas la kutimo doni al la kelnero trinkmonon post ĉiu manĝo. Se vi forgesas la kutimon vi ne ricevos tre bonan atenton.

Foje mi incitetas la onklinon pri ŝia uzo de servistoj. Tio okazis en unu el la Sudaj Ŝtatoj, kie la kelneroj estas ĉiuj nigruloj aŭ (kiel ili preferas esti nomataj) sinjoroj koloraj:

Preskaŭ mi povas ankoraŭ nin vidi. Ni sidas ĉe la tablo atendantaj. Post la onklino staras nigrulo, per du ventumiloj ventumante ŝin. Post mi alia faras la saman servon. Tria nigrulo estas ricevinta la ordonojn, kaj, ĉar ni iom longe atendas, la onklino sendas kvaran por vidi se eble li estas ekdorminta.

Subite io frapas mian piedon. Mi malsuprenrigardas kaj vidas, ĉirkaŭtatan de sia grandombra idaro grandegan ratinon.

La onklino ekkrias kaj tuj dungas kvinan nigrulon por svingegi sian buŝtukon kaj kriegadi "ŝ-ŝ-u!"

Vane oni klarigas ke la ratino estas tute malsovaĝa; ke oni kutimas ĝin nutri; ke ĝi ne eĉ pensas iun mordeti.

Vane oni svingegas kaj ŝ-ŝ-u-as.

Ratino estas ratino; sed ratino kun idarego—

La onklino insistas ke ni ŝangu la tablon, kaj elektas unu plej eble malproksime de la ratfamilio. Sed apenaŭ ni estas sidinta nin, kiam aperas la skaraboj, ĉiu el ili grandegulo.

Feliĉe nigruloj havas grandegajn piedojn. La onklino dungas sesan kiu okupas sin per dancado sur la scarabegojn.

Certe tiu estas tute neordinara sperto. La onklino diras ankaŭ ke ŝi nur dungis kvin nigrulojn; ke la sesa ekzistas nur en mia fantazio; sed mi ĉiam insistas ke ŝi uzis ses. Eble mi enkalkulas la nigrulon kiu ventumis min mem. Sed ni ne diros tion al la onklino.

Amerikoj ofte sidas en la vestibuloj de la hoteloj. Almenaŭ kelkaj el ili maĉas tabakon kaj ne ĉiuj uzas kraĉujojn. Mi ne deziras pritrakti la temon. Mi nur citos la tute netradukeblan avizon kiun mi foje vidis, certe ne en la plej bonaj hoteloj.

"People who expect to rate as gentlemen must not expectorate the floor."

("Tiu ĉi kiuj atendas esti ricevataj kiel sinjoroj, devas ne kraĉi sur la plankon").

Kredeble multaj ne "expect to rate" kiel sinjoroj.

Kiel ofte mi vidis la glaciigistojn tirantaj per grandegaj preniloj porcion da glacio trans la planko de hotelvestibulo, kaj vidante la malpuraĵojn kiuj algluis sin al ĝi, mi—

Sed kredeble oni forhakas tiun eksteran supraĵon. Mi preferas pensi ke oni ne eĉ uzas ĝin por ĉirkaŭpaki la malvarmigujojn.

Pri la malvarmigujoj mi nur diros ke mi tre ŝatas ilin. Tiu kiu neniam dum varmega tago, trinkis glason da lakto, freŝe eltiritan el la malvarmigujo (refrigerator) ne konas treege bongustan trinkaĵon. Pri la malvarmigita teo mi ne skribos. Amerikoj ĝin trinkas; la onklino diras ke la gusto estas agrabla. Sed kredeble oni devas alutimigi al ĝi, kaj mi ne faris tion.

Unu afero mi faris. Kiam ajn mi trinkis glaciigitan akvon mi diris al mi la tekston: "Ne tio kio eniras en la homon malpurigas lin."

## ORIENTAJ MEMORAĴOJ.

De Kolonelo H. K. Gordon.

La Birmanoj estas tre agrablaj, kvankam iafoje ekscitemaj; la virinoj estas tre graciaj, krom aferemaj: la knaboj, kaj eĉ la viroj tre amas ludojn, tiel piedpilko, flugludado, pugnebato, ŝipkrado, vetado, kaj ĉiuj "Marionette" teatrajn ludajn. Ĉiuj sin banas ĉiutage. Preskaŭ ĉiu viro estas tatuata. Preskaŭ ĉiuj portas silkvestaĵojn.

"Rangoon," la ĉefurbo, sur bordo de la rivero

"Irrawaddy," estas granda kaj prospera. Domoj estas preskaŭ ĉiuj konstruitaj el tektona ligno; sekve estas ofte bruladoj.

Riveroj estas tre longaj: oni povas vojaĝi sur la "Irrawaddy" pli ol mil mejlojn sur vaporŝipo ĝis la Ĥinlandaj limoj. Multo da Ĥinoj loĝas en Birmanujo: oni ilin trovas honestaj kaj aferemaj urbanoj.



Strange diri, la Ĥinoj neniam akceptas domservon, kvankam ili ĝin akceptas en najbaraj lokoj, ekz. "Singapore" kaj "Penang." Ili estas tre bonaj ĝardenistoj.

La pluvfalo en iaj lokoj estas grandega, dum la kvinmonata pluvsezono, nome, de Junio ĝis Oktobro: falas ĉe havenoj de "Akyab" kaj "Moulmein" mezakvante pli ol ducent coloj: ofte en unu tago falas pli da pluvo ol falas en Anglujo dum tuta jaro! Severaj fulmotondroj enkondukas la pluvsezonon; tamen ofte post kvarono da horo polvo fluigas el stratoj sub la ega hejto de la sunradioj. Sekaj riveretkanaloj post mallonge fariĝas saŭmaj kaj danĝeraj torentoj.

Kiam tiuj torentoj trankviliĝas, oni povas plezure sin bani inter pentrindaj ĉirkaŭaĵoj.

Ŝafoj ne povas vivadi en Birmanujo: oni alkondukas ilin sur semajnaj vaporŝipoj de "Calcutta." Landanoj tre ŝatas fiŝojn: precipe la malfreŝajn fiŝkunmetojn!

Lepruloj estas komunaj: tamen de ili oni ne penas zorgi.

Krom bonaj orangoj, la fruktoj enlandaj la plej ŝataj estas la "Dorian" (Dujan) kaj la "Mangosteen" (Mangostin): kvankam, ne estas ĉiu kiu povas toleri la odoron malagrablegan de tiu unue skribita. Oni ankaŭ trovas la "Cachonnut" (Kaŝunukson): servistoj ne volas ilin kuiri apud ies domo, dirantaj ke febro sekvos: estas ja strange, tamen mi ĝin kredas vera.

La lingvo estas por Eŭropanoj tre malfacila: la pensadmetodoj estantaj tute malsimilaj. La lingvo de la Budista Pastraro estas antikva "Pali," nekomprenebla al la popolo, kaj ne ĉiam al la pastroj mem! Estas multo da temploj (Pagoda), sur preskaŭ ĉiu monteto apud urboj kaj vilaĝoj, kaj kvankam ĉiu Birmano devas pasi por edukado tra la manoj de Pastroj, tamen oni ne atentis severe la Budistajn religiajn ordonojn. Samtempe, se la Pastraro postulas monon por konstrui novan templon, la sekvantaro tuj ĝin provizas. Konstrui templon estas tre meritinda afero. Estas religie ordonita ne mortigi ion ajn: tamen, kiel Ĥinoj, la Budistaj Birmanoj povas esti krulegaj. Ili ofte fariĝas tre komplezaj, kaj kontente pagos moneron por liberigi paseron el la manoj de almozulo, malgraŭe li bone scias ke la pasero estas retenata per ŝnureto, por rekaptigi! Li irigos ĉevalon ĝis ĝi estas mortonta: sed se ĝi mortus, li dirus, "Tio ne estas mia kulpo."

La tuta lando fumias: la Birmanoj, verdan folion enhavante dolĉan miksaĵon: alilanduloj, tabakon enportitan el Hindujo, kaj loke fabrikitan. Se oni trempas tabakon en lakto de kakao, gorga malsaneco certe sekvas.

Sovaĝmielo estas kvante trovata en la arbaroj: sed ĝia ĉefa celo estas por la enterigo de sanktaj

Budistpastroj. La pastraro ĉiam elektas tre belajn sidajn por konstrui siajn rimarkindajn templojn. La preĝejoj orumitaj turoj ŝajnas mirinde graciaj en la hela sunlumo, kun la verda kreskajaro postflanke, kaj la brila rivero malsupre. Sur ĝiaj pordoj kaj pordeĝaj oni trovas belegan ĉisatan lignaĵon (ĉiam tektono), por kiun verki la ĉisisto bezonas mirinde malmulte da iloj. La turpunkto ĝenerale enhavas skatolo de multekostaj juveloj, donacitaj de religiuloj Budistaj: kaj supre ĉion, estas ĉiam la "Ĥti," aŭ Reĝa ombrelo.

Ĉe la bestaro, estas iaj rimarkindaĵoj: ekzemple, ŝakaloj, kiuj estas komune renkontataj en la Bengala provinco, ja en tuta Hindujo, sin trovas ĉe la nordflanko de ofte seka riveretkanalo apud la urbo, "Akyab," kaj nenie ĉe la sudflanko. Simile, la antaŭdiritaj fruktoj, *Dujan* kaj *Mangostin*, kreskadas ĉe la sudflanko de la Riverego, "Salween" apud la urbo de "Moulmein," sed nenie ĉe la nordflanko.

El multo da serpentoj, la plej danĝera estas la venena "Hamadryad" aŭ "Reĝa Kopro," kiu ĉasas kaj atakas homojn. Grandaj Hirudoj estas tre komunaj en la riveretoj kaj lagetoj. Multe da skolopetoj alvenas ĉiujare ĉe la malvarma sezono (Nov. al Marto): oni povas pafi cent birdojn kaj pli en unu tago en la rizkampoj. Oni kredas ke estas bonŝance havi en sia domo la "Tuktu," lacerton, makulatan simile al truto: ĝi mangas insektojn, kaj nokte vokas mistere el plafono, "tuktu, tuktu."

Tiel ĉie en Hindujo, ĉiu stacio havas "Gymkhana" Klubo, aŭ kunvenejo por Eŭropaj loĝantoj, kie sin trovas ĵurnaloj, biblioteko, kaj ludoj. Malgraŭ malseka kaj varmaga klimato, mi vivadis multe da agrablaj jaroj en Birmanujo.

Oni povas vivadi sane per zorgo pri mangado, trinkado, kaj sunefikoj: tamen, ĉiam malfacila estas meti maljunajn kapojn sur junaj ŝultroj.

Unufojon, mi suferis de malaria febro: tamen, vojaĝante al Islando, apud la Arktika regiono, mi efektive resaniĝis, kaj poste la febro neniam revenis. Tie ankaŭ oni facile resaniĝas de pulmaj kaj de reŭmatismaj malsanoj.

Krom lignosegmueliloj, ekzistas multe da grandaj rizmueliloj ĉe la havenoj: la rizo sin produktas enlande, kaj estas liverata per boatoj: tiam ĝi estas ŝelata kaj polurata per maŝinaro ĉe mueliloj preta por ekstersendi. Estas multaj specoj da rizo, kiujn lerto povas distingi ĝuste: same, diru ni, kiel pomoj en Eŭropo.

Ĉe la lasta Birmana militiro, granda peno okazis por la Administracio, por nutri la Hindajn soldatojn, ĉar ili rifuzis manĝi la Birmanan rizon: kaj, pro tio, la Administracio devis provizi kun plua elspezo Hindan rizon, kvankam Eŭropoj ne povis distingi ian diferencon.

(*Daurigota*).

## ESPERANTAJ TERMINOJ POR ESPERANTA GRAMATIKO.

Verkita de R. J. Lloyd, D.Lit., M.A., de la Universitato de Londono, kaj Diplomito de la Franca Societo kaj de la Brita Asocio por Esperanto.

*La Aŭtoro ĉiajn rajtojn rizervas.*

Skribante serion da artikoletoj pri Esperanta sintakso en la *British Esperantist*, mi sentis ke multe da la terminoj, kiujn oni ordinare uzas en Esperanta gramatiko, ne estas ĝuste la plej bonaj. La terminoj kiujn oni uzas, estas, preskaŭ ĉiuj, terminoj devenintaj de la latina gramatiko, kvankam ili estas ankaŭ multe uzataj de la modernaj Eŭropaj lingvoj. Tiel farante, la modernaj gramatikistoj estis tute ne tiel saĝaj aŭ originalaj kiel la latinaj gramatikistoj, kiuj kreis tiujn ĉi terminojn. Ŝajne imitante ilin, reale ili faris la kontraŭon. Ĉar la antikva latina gramatikisto, instruante personojn, kiuj parolis ordinare latine, faris, tre saĝe, siajn terminojn ĉiuj latinaj. La rezultato estis ke ĉiu termino de la latina gramatiko ne nur nomis, sed ankaŭ priskribis, al la latinaj homoj, la terminojn kiujn ili devis uzi. Sed la modernaj gramatikistoj, preskaŭ ĉiuj, simple kopias la latinajn terminojn, kaj forpelas la saĝan latinan metodon, doni patrujajn nomojn al patrujaj aferoj.

Kaj estas ankoraŭ pli malkonvene uzi tiujn ĉi latinajn terminojn en Esperanto. Ĉar Esperanto ofte donas al tiuj ĉi samaj terminoj signifon kaj uzadon diversajn de tiuj, kiujn ili posedas en la latina, kaj ankaŭ en la modernaj, lingvoj. D<sup>ro</sup> Zamenhof ŝajnas senti tion en la "*Plena Gramatiko*" (Krest, p. 254-6); ĉar li faras kaj uzas, en tiuj du paĝoj, pli multe da Esperantaj gramatikaj terminoj ol la tuta Esperantistaro estas alie farinta kaj uzinta.

La homoj kiuj bezonas pleje la Esperantan lingvon, estas la klasoj, kiuj ne havas multan tempon por lerni aliajn lingvojn, kaj ne multe da mono por pagi la instruadon. D<sup>ro</sup> Zamenhof vidis tion kaj diris ĝin tute klare. Mi kredas ke la plimulto da la Angla Esperantistaro apartenos ĉiam al tiuj ĉi klasoj: kaj ili scias tre malmulton pri iuj gramatikaj terminoj: ĉar la Anglaj popolaj, elementaj lernejoj instruas tre malmulte pri ili. La tempo estas nur sufiĉa por nia terura silabado. Tial la Angla Esperantistaro bezonas sinespliktajn gramatikajn terminojn, pli ol iu alia nacia Esperantistaro.

Mi volas tial skizi, kaj proponi por diskutado, antaŭ la Bulonja Kongreso, serion de Esperantaj gramatikaj terminoj. Oni povas rigardi la naŭ ĉefajn partojn de la parolado, kiel la ĉefaj instru-

mentoj de la parolado: kaj kunmetante nomojn por ili, estos tute nature uzi la sufikson "-ilo":—

### Paroliloj.

1. Artikolo ... ..La-ilo = La instrumento, "la."
2. Substantivo ... ..Nom-ilo = La instrumento, de nomado.
3. Adjektivo ... ..Ec-ilo = La instrumento, por esprimi ecojn.
4. Adverbo ... ..Tiel-ilo = La instrumento, de maniero.
5. Pronomo (parte) ...Pro-ilo = La instrumento, anstataŭ nomilo, ecilo aŭ tielilo.
6. Verbo ... ..Dir-ilo = La instrumento, por diri ion.
7. Prepozicio ... ..Rilat-ilo = La instrumento, de nomilorilatoj.
8. Konjunkcio ... ..Kunig-ilo = La instrumento, de kunigo.
9. Interjekcio ... ..Kri-ilo = La instrumento, de kriado.

Sed sub ĉiu el tiuj ĉi ĉefaj vortoj ekzistas aliaj diferencigantaj vortoj, kiuj dividas ĉiam la klason de vortoj signifitaj de ĉiu el tiuj ĉi naŭ nomoj en pli malgrandajn (aŭ sul-) klasojn. Estas ofte *eciloj*, kiuj faras tion,—ne *nomiloj*. Mi prenos la naŭ serie, kaj penos fari Esperante por ĉiu la subvortojn, kiujn ĝi bezonas: kaj mi uzos tie ĉi ĉiun novan vorton, post esplikado de ĝi.

1. *Lailo* bezonas du gramatikajn *ecilojn* por signifi (1) sian montran uzadon, kaj (2) sian universaligantan uzadon; ekzemple, en "la homo, kiun vi konas," kaj en "la homaro." Mi proponas "difina la-ilo" por la unua, kaj "universala la-ilo" por la dua.

2. *Nomilo* bezonas (1) la du *ecilojn* "propra" kaj "komuna," kaj ankaŭ (2) "reala" kaj "idea" (=konkreta kaj abstrakta). Ĉiu nomilo estas aŭ propra aŭ komuna, kaj ankaŭ, aŭ reala aŭ idea; sed la propra nomilo estas ankaŭ ĉiam reala. Estus eble ankaŭ helpo, nomadi la realan nomilon, "realilo," kaj la idean nomilon "ideilo." Ĉiu ecilo estas ankaŭ aŭ propra aŭ komuna.

Nomilo kaj ecilo posedas "nombron" kaj "kazon"; kaj tiuj ĉi du simplaj vortoj ne bezonas esti ŝanĝataj. Kaj la pure Esperantaj vortoj, "ununombra" kaj "multenombra," ne povas esti plibonigitaj. Sed la kazaj nomoj, "nominativo" kaj "akuzativo," tute ne konvenas al nia kara lingvo. Per formo ili signifas Esperante nenion; kaj ni ofte nomas nomilon

“nominativo,” kiu estus neniam nominativo en tia frazo en iu alia lingvo. Sed ne estas eble doni, al la unu aŭ al la alia, nomon kiu signifos en Esperanto ĝian funkcion; ĉar ambaŭ havas tie pli ol unu funkcion. Ŝajnas tial preferinde doni al ili nomojn laŭ iliaj formoj. La unu havas “-n” ĉe la fino: la alia ne havas tion. La Esperanta nomo de la litero “n” estas “no.” Mi proponas tial nomi la nominativan kazon la “sen-no-a” kazo, kaj la akuzativan, la “no-a” kazo.

Nomilo ofte prenas ĉe sia flanko, alian, difinantan, nomilon en la sama kazo, ekzemple, “Vilhelmo la kaizaro renkontis Edwardon la reĝon.” Mi nomus tiujn, “difinajn” nomilojn, anstataŭ ol uzi la ordinaran gramatikan esprimon, “en apozicio.”

Aperas ankaŭ ofte nomilo, kiu diras ion pri alia nomilo aŭ pronomo, ekzemple, “Li estas Franco.” Oni ordinare nomis ĝin “predikateca substantivo,” sed kial ne “pridira nomilo?”

Estas ofte konvene paroli pri la kontrolo, kiun la formoj de la nomilo ekzercas sur la formoj de la apartenanta ecilo. La nomilaj finoj “-n, -j, -jn” postulas ordinare la samajn finojn en la ecilo. Estus plej simple nomi tiun ĉi rilaton “samfinesco.” La ecilo estas “samfina” kun sia nomilo: kaj la rilato estas multe pli “kontrolo” ol “konkordo” aŭ “konsento.”

3. *Ecilo* estas la sola speco de Esperanta vorto, kies formo pendas de iu alia vorto en la frazo: Ĉar partecipo estas ĉiam ankaŭ ecilo, kvankam ecilo ne estas ĉiam partecipo. Ĝi havas du ĉefajn uzadojn, la du samajn uzadojn, kiujn ni nomis, parolante pri la nomilo, (1) la “difina,” kaj (2) la “pridira” uzado, ekzemple, “Reĝa Edwardo,” = difina, kaj “Li estas Franca,” = pridira. La pridira ecilo havas ĉiam sennoan kazon, kaj tio estas la sola kaŭzo de la malofta “malsamfinesco” inter nomilo kaj ecilo en Esperanto.

Ni parolas ordinare en Esperanto pri “komparativaj adjektivoj” kaj “superlativaj adjektivoj.” Ĉu ne estus multe pli simple kaj pli instruante, nomi ilin “pli-eciloj” kaj “plej-eciloj?” La nombraj eciloj formas apartan klason. La simpla nombro ne havas ecilan finon: ĝi ne estas ĉiam ecilo. Oni povas doni al li la nomon de “simpla,” kiam estas necese distingi ĝin de la “orda,” la “ona,” la “obla” kaj la “opa” nombro. Estus perdo de tempo doni al tiuj ĉi nombraj vortoj la longajn teknikajn nomojn de la ordinara gramatikoj. Estas ankaŭ klaso de “kiomaj” eciloj, kaj nomiloj, kaj tieliloj, kiuj bezonas apartan nomon, ĉar ili havas apartan gramatikan traktadon, per “da.”

4. *Tielilo*.—La Esperanta tielilo (instrumento de maniero) havas gravajn uzadojn, kiuj tute ne estas adverbaj. Tial estas pli bone havi alian nomon por ĝi. Mia lasta frazo montras tion klare.

Esperante la vorto “bone” estas ofte nomita adverbo; sed ĝi ne estus en iu alia lingvo adverbo, en tiu ĉi frazo. Kaj la participaj adverboj ofte estas vere gerundioj. Tial estus plej bone havi alian nomon, ne nur por la tuta parolilo, sed por ĉiu el ĝiaj specoj. Ĝi havas tri specojn, (1) la “difina” tielilo, kiu difinas verbon, ecilon aŭ alian tielilo, guste tiel kiel la ordinara adverbo; (2), la “cirkonstanca” tielilo, kiu estas la participagerundio; kaj (3) la “pridira” tielilo, kiu “diras” ion “pri” fakto enhavita en najbara suba frazo, ekzemple, pri la fakto “havi alian nomon por ĝi” en la supera frazo. La lasta formo faras la tielilon de la Esperanta lingvo multe pli analogia al ĝia nomilo kaj ecilo ol la adverboj de iu alia lingvo. Oni vidos ankoraŭ tiun analogion en la proksima paragrafo, kie tielilo estas ne nur “difina” sed ankaŭ “pridira,” tiel kiel eciloj kaj nomiloj.

5. *Proiloj*.—La antikvaj gramatikistoj ne atentis multe la tri diversajn specojn de anstataŭantaj vortoj—vortoj kiuj anstataŭas (1) nomilon, (2) ecilon, (3) tielilon. Ili studis ĉefe la unuan, kaj nomis ĝin “pronomo”: ili konfuzis multe la duan kun la unua: kaj diris preskaŭ nenion pri la tria. Esperanto bezonas pli logikan kaj sisteman nomaron. Akceptante “pronomo” kiel bona nomo por la unua klaso, oni devas fari paralelajn nomojn por la du aliaj. Mi proponas por la dua, “proecilo,” kaj por la tria, “protielilo.”

Tio estas tute logika, ĉar neniu el tiuj ĉi gravaj vortoj havas la plej malgrandan signifon per si. “Tio” signifas simple nenion, se oni ne diras aŭ montras samtempe kio estas “tio.” Kaj la samo estas vera pri la proecilo “tia,” aŭ “tiu,” aŭ “ties,” aŭ pri la protielilo “kial,” aŭ “kiam,” aŭ “kie,” aŭ “kiel.” Ili nur havas signifon pro, kaj per, kaj por, io alia, kaj nenium signifon pro, per aŭ por si mem.

Oni estas nun en la mezo de la tabelo de 45 proiloj, kiujn Doktoro Zamenhof tiel saĝe kaj lerte aranĝis; sed mi havas nur spacon por montri, tre mallonge, kiel mi nomus la 9 liniojn kaj 5 kolonojn de tiu fama tabelo. Mi donus al la linioj nomojn prenitajn aŭ faritajn el la naŭ vortoj de la demanda kolono: “kiaspeca, kiala, kiama, kiea, kiela, kiesa, kioesta, kioma, kiuesta.” Kaj mi donus al la kolonaj la nomojn, “(1) nedifina, (2) universala kaj disdona, (3) rilata kaj demanda, (4) nea, (5) montra.”

Personaj pronomoj, kun “oni,” povas bone gardi sian nomon, kvankam “ĝi” estas malofte estas “si” estas ankaŭ “refleksa,” kaj “oni” estas “nedifina.” La du serioj de posedaj vortoj (“mia, k.t.a.”; kaj “ies, k.t.a.”) ne estas rajte nomataj posedaj pronomoj, sed “posedaj proeciloj.” Estas vere ke la lastaj estas ofte uzataj pronome, sed tio estas nur per komuna kapableco de eciloj.

6. *Dirilo*.—Sen verbo oni ne povas diri ion, kio havas iun sencon. Mi nomas tial la verbon “dirilo.” Ĝi havas du ĉefajn formojn, kiujn oni nomas “voĉoj.” Sed tiu nomo ne estas logika. Estus pli bone nomi ilin la “aktiva formo” kaj la “pasiva formo” de la dirilo. La aktiva formo enhavas du specojn, kiujn oni nomas ordinare “transitiva” kaj “netransitiva.” Tiuj ĉi du nomoj estus multe pli kompreneblaj en Esperanto, se oni farus ilin “transira” kaj “netransira.”

La dirilo havas “modojn”: kaj la vorto estas tute konvena. Sed la nomoj de ĉiu modo estas preskaŭ fremda al la Esperanto,—“indikativa, imperativa kaj subjunktiva, kondicionala, infinitiva.” Estas nur du aŭ tri Esperantaj radikoj en la tuta afero. Estus multe pli simple kaj kompreneble al la sengramatika lernanto, nomi la indikativan la “fakta” modo, kaj la kondicionalan, la “supoza” modo. Dro. Zamenhof nomas la infinitivon, la “sendifina” modo. Li nomas ankaŭ la imperativan kaj subjunktivan modon, la “ordona” modo. Sed tiu ĉi nomo nomas nur la duonon de la modo; kiu ofte estas ĝuste tiel nedubbele subjunktiva, ol ĝi estas alifoje ordona. “Li deziras (petas, celas, timas) ke vi iru tien” finiĝas certege per subjunktiva frazo. Estas tamen malkonvene, havi du nomojn por unu modo: kaj la du duonoj de la modo ne estas tute diversaj. La latina kaj greka subjunktivoj estas ofte ĝentile ordonaj. La subjunktiva uzado de la Esperanta modo “atendas” ĉiam ion, kio povas, pli aŭ malpli certe, “okazi” post la ordono, deziro, peto, celado, timo, k.t.a., kiujn la antaŭa dirilo esprimas. La ordona uzado esprimas ĝuste la samon, ellasante nur “Mi ordonas ke—.” Ĉar la vizaĝo kaj gestado de la ordonanto esprimas tion. Mi proponas “okazatenda modo.”

Modoj havas tempojn, kaj Dr<sup>o</sup> Zamenhof donas al la tri ĉefaj tempoj aktivaj de la fakta modo, tri bonajn Esperantajn nomojn (1) “la estanta,” (2) “la estinta,” kaj (3) “la estonta,” ekzemple (1) mi faras, (2) mi faris, (3) mi faros; sed ĉiu alia tempo aktiva, kaj ĉiu ebla tempo pasiva, estas kunmetita, kaj havas pli ekzaktan funkcion ol la 3 unuvortaj tempoj, ekzemple, (1) mi estas farata, (2) mi estis farata, (3) mi estos farata, estas la estanta, la estinta kaj la estonta tempoj de la pasiva fakta modo. Sed ili estas pli ol tiu. Faritaj per la estanta participo ili povas nur esprimi agadon, kiu ne estas finita, kaj daŭras. Por esti akurata, oni devas nomi tiujn ĉi tri tempojn pasivajn, la “daŭrestanta, daŭrestinta, kaj daŭrestonta.” Kaj se oni anstataŭas la estantan participon “farata” per la estantan participon “farita,” oni faras ankoraŭ tri bonajn Esperantajn tempojn, sed ankoraŭ ne simple la estanta, la estinta kaj la estonta; ĉar la agado estas neniam daŭra, sed

finita, je la dirita tempo. Oni havas tial ne plu daŭrtempoj sed fintempoj, (1) “finestanta tempo” = “mi estas farita,” (2) “finestinta” = “mi estis farita,” (3) “finestonta” = “mi estos farita.” La latina studento rekonos tuj ke tiuj estas ekzakte la perfekta, la pluperfekta kaj la futurperfekta pasivaj faktaj tempoj de la latina dirilo.

Restas ankoraŭ nur tri eblaj pasivaj tempoj, faritaj el la estonta participo pasiva, kaj la tri unuvortaj faktaj tempoj de “esti” = (1) mi estas farota, (2) mi estis farota, (3) mi estos farota. Sekvante la du aliajn triojn, oni nature nomus tiujn ĉi tri tempojn, la antaŭtempoj, (1) la “antaŭestanta,” (2) la “antaŭestinta,” kaj (3) la “antaŭestonta.”

Mi traktas la pasivan sistemon de tempoj unue, ĉar ĝi estas pli simetria, kun sia  $3 \times 3 = 9$  egalinterspacaj tempoj, ol la aktiva, kun siaj tri aldonitaj unuvortaj tempoj. Sed estas nur por tiuj ĉi tri tempoj, ke oni bezonas iun terminon plu. Ĉar oni faras la aktivajn kunmetitajn tempojn, kaj nomus ilin, ĝuste same ol la pasivaj, nur uzante la aktivajn participojn anstataŭ la pasivajn. Estus sufiĉe, ordinare, lasi tiujn ĉi tri unuvortajn tempojn havi nur iliajn unuvortajn nomojn, aldonante nur, kiam necertece povus ekzisti, la radikon “simpl-” (= simplestanta, simplestinta, simplestonta).

Ne estas bezono de iuj aliaj dirilaj terminoj. Oni povus, nature, fari kunmetitajn tempojn en la “supoza,” la “atendokaza” kaj eĉ la “sendifina” modo, sed ĉiu el ili havus ĉiam la saman nomon ol en la “fakta” modo.

La novaj Esperantistoj favoras multe pli la kunmetitajn tempojn ol la pli fruaj, kaj tio estas vera pligrandigo de la kapablecoj de la kara lingvo. Estas nur unu “helpa” (= aŭkziliaria) dirilo en Esperanto: tio estas “esti.” Sed estas granda nombro da “modaj” diriloj, tiaj kiaj estas “povi, bezoni, devi, voli, deziri, ami, preferi, elekti, k.t.a.,” kaj oni rekonas ilin per la foresto de “por.” Komparu “Mi elektas iri” kun “Mi batalas por iri”; aŭ “Mi timas iri” kun “Mi kuras por iri.”

7. *Rilatilo*.—La antikva nomo estas prepozicio, kaj ĝi signifas ion antaŭponitan. Sed la vorto ne montras tion en Esperanto, kaj tio ne estas ankaŭ la faktan, kiu meritas esti montrata per ĝia nomo. La prepozicio rilatas la nesubjektajn kaj neobjektajn nomilojn ĉiujn al la resto de la frazo. “Rilatilo” estus tial bona kaj informanta nomo por ĝi.

8. *Kunigilo*.—La ordinara vorto “konjunkcio” estas tute komprenebla en Esperanto, sed “kunigilo” estas egale signifa, kaj harmoniigis multe pli bone kun la ceteraj tieaj proponaj.

9. *Krilo*.—Tiu ĉi estas multe pli logika nomo ol “interjekcio.” Tio signifas, nature, ion inter-

jetitan. Sed en la natura kurado de interparolado, la interjekcio okazas multe pli malofte inter la vortoj ol antaŭ ĉiuj aliaj vortoj. Ĝi estus reale nomo pli konvena por parenteso. Mi proponas tial "kriilo."

Tiuj ĉi ideoj venis nur en mian kapon antaŭ du semajnoj, sed ili ŝajnis al mi tre utilaj kaj gravaj. Tiel mi rapidis por presigi ilin antaŭ la Kongreso.

## KLOPODU.—HIMNO ESPERANTA.

Originale verkita de M. R. Keesing (Auckland, N.Z.).

Antaŭen! Antaŭen! Ne restu momenton!

Etendu la povan, la magian senton.  
Flugigu standardon trans tuta la mondo,

De ambaj polusoj ĝis ĉirkaŭ la rondo.

Popoloj, ho! aŭdu, jen estas stimulo  
Por plu altaj celoj, sen ia makulo;  
Antikva deziro atingas plenumon,  
Triumfe venkante disvastigas lumon.  
(Horaro).

Kuraĝu! Kuraĝu! Vi bravaj amikoj,

Plilarĝigu ĉiam per daŭraj efikoj  
La bonan laboron, kun korega kanto.  
Ho! antaŭeniru por la Esperanto.

March forward! March forward! Delay not your  
striving,

The moment of victory now is arriving.  
Fly boldly the standard through all the world's  
regions,

All round the earth's compass assemble your  
legions.

O! peoples, attend, for we give you a treasure,  
Exalting your aims by a pure, spotless pleasure,  
Fulfilling the longing of great ancient sages,  
For light and advancement, creating new ages.  
(Chorus).

Have courage! Have courage! Ye brave-hearted  
brothers,

Extend the boon further to benefit others.  
Sing gladly in chorus a soul-stirring canto,  
To spread far the praises of sweet Esperanto.

MAURICE R. KEESING,

*Principal of The Cosmopolitan College, Auckland, N.Z.*

## LA LETERO AL LA BAPTO-PATRO.

El la Veillée, tradukita de Elise Bauer.

PERSONOJ.—*Paŭlo*: dekjara. *Johanino*: okjara.

Ambaŭ sidas ĉe la tablo skribontaj. Paŭlo elstrekas kaj skrapetas. Johanino rigardas la plafonon. Ambaŭ sopiras.

*Johanino*. "Paŭlo!"

*Paŭlo*. "Kion?"

*Johanino*. "Ĉu ci jam skribis multon?"

*Paŭlo, montrante folion nigran je inkmakuloj kaj elstrekaĵoj*: "Jen!"

*Johanino*. "Sed ĝi estas tute elstrekitaj!"

*Paŭlo*. "Nu, kaj ci?"

*Johanino, montrante blankan folion*. "Jen!"

*Paŭlo*. "Sed ĝi estas tute blanka!"

*Johanino*. "Kun ĉia nigra, kaj mia blanka folio, ni estas ĉe la sama punkto."

*Paŭlo*. "De tri kvaronoj da horo!"

*Johanino*. "La patrino diris al ni: 'Estos baldaŭ la nomofesto de ĉia bapto-patro. Skribu al li ambaŭ beletan letereton.' Kaj ni ambaŭ trovas nenion!"

*Paŭlo*. "Tio mirigas min, precipe de ĉia flanko."

*Johanino*. "Nu, kial?"

*Paŭlo.* "Li ne estas mia vera bapto-patro, sed cia."

*Johanino.* "Jen bona motivo! Li dorlotas cin tiel multe kiel min."

*Paŭlo.* "Tio ĉi estas vera. Ni multe amas lin. Se li estus tie ĉi, ni havus multegon porrakontialli."

*Paŭlo.* "Fratineto! Mi havas ideon! Ni faru tiel kiel la Blindulo kaj la Lamulo!"

*Johanino.* "Kiel!"

*Paŭlo.* "Ni helpu unu la alian. Vi estas malpli granda ol mi—tio ĉi ne estas grava, oni ofte bezonas pli malgrandan ol si."

*Johanino.* "Ĉu tio ĉi troviĝas en la Blindulo kaj Lamulo?"

*Paŭlo.* "Tie, aŭ aliloke. Diru al mi ciajn ideojn. Mi diros al ci la miajn, kaj ni ambaŭ subskribos."

*Johanino.* "Jes, frateto mia, tio ĉi estas bonega. Komencu!"

*Paŭlo.* "Ne, ci komencu!" *Ili rigardas unu la alian nedecidite, tiam ekridas.* "Ni estu seriozaj!"

*Johanino, pripensante.* "Ni povas skribi: Kara Bapto-patro, . . ."

*Paŭlo.* "Certe!" *Leviginte, kaj alproksimiĝinte Johaninon, li skribas sur la blankan folion* "Kara Bapto-patro . . ." "Vi vidas, la ideoj jam venas."

*Johanino, penante imagi ion.* "Kara Bapto-patro, Estos post morgaŭ via bapto-festo."

*Paŭlo.* "Li devas scii tion."

*Johanino.* "Eble li estas forgesinta ĝin. Pensu, li estas nur fraŭlo. Li havas nek gefilojn nek geneopojn."

*Paŭlo.* "Estas feliĉe ke li havas nin!"

*Johanino.* "Jes, por doni donacojn al iu."

*Paŭlo.* "Hm, mi havas ideon!"

*Johanino.* "Diru ĝin!"

*Paŭlo.* "Oni devus lerte . . . mi fidus je ci. . ."

*Johanino.* "Flatulo!"

*Paŭlo.* "Sciigi al li, ke mi deziras poŝt-mark-albumon."

*Johanino.* "Kial?"

*Paŭlo.* "Por la okazo, ke li deziras donaci ion al ni por sia nomofesto."

*Johanino, prenante la plumon kaj skribante sur la saman folion.* "Atentu!"

*Paŭlo.* "Sed tre delikate. Ci komprenas!"

*Johanino.* "Ne malkvietiĝu! Mi skribos tute laŭte." *Ŝi skribas:* "Mia frato posedas belan kolektaĵon da poŝtmarkoj. Se li havus albumon . . ."

*Paŭlo.* "Ruĝan! Albumon ruĝan!"

*Johanino, obeeme skribante.* "Albumon ruĝan li estus tre feliĉa. Sed li ne havas sufiĉe da mono por aĉeti unu."

*Paŭlo.* "Jen! Tiele ĝi estas tre delikate esprimita! Parolu nun iom pri lia sano."

*Johanino, skribante.* "Ni esperas, ke via sano estas ĉiam bona."

*Paŭlo.* "Ne, ci ja scias ke li plendas senĉese!"

*Johanino, skribante.* ". . . Ĉiam bona, tio estas ankaŭ malbona. Antaŭ kelkaj tagoj nia patro diris ke vi similas la fantazian malsanulon. Mi lin demandis kio tio ĉi estas, kaj li respondis, ke ĝi estas malsanulo por ridigi. Tio ĉi plezurigas nin por vi." *Interrompante sin.* "Nun ni devas paroli pri la vestaro!"

*Paŭlo.* "Pri kia vestaro?"

*Johanino.* "Pri tiu, kiun mi deziras por mia pupo."

*Paŭlo.* "Ha, jes! Donu!" *li prenas la plumon kaj aldonas al la letero.* ". . ." "Mia fratino deziras vestaron de pupo. La knabinoj, vi scias, ili revas nur pri pupoj?"

*Johanino.* "En vestkesto! Skribu."

*Paŭlo, skribante.* "Ili revas nur pri pupoj-en vestkesto la vestaro."

*Johanino, rigardante la paĝon.* "Tio ĉi formiĝas!"

*Paŭlo.* "Stilo de Sinjorino de Sevigné! Sed ŝi ne havis fraton kiu helpis ŝin! Nun ni devas diri, ke ni estas bonaj, kaj ke ni lernas diligente."

*Johanino.* "Tio ĉi ne estus modesta."

*Paŭlo.* "Ja jes, ci laŭdos min, kaj mi laŭdos cin!"

*Johanino.* "Bona ideo!" *skribante,* "Paŭlo estas tre diligenta, Li laboras bonege. Li estas tre ĝentila al mi." *Ciu rico.*

*Paŭlo, skribante siavice.* "Kaj mia fratino estas la plej bona el ĉiuj knabinoj."

*Johanino, kizante tin.* "Kiel bone ci diris tion ĉi!"

*Paŭlo.* "Ĉar mi pensas tiel." *Kizante ŝin.*

*Johanino.* "Nia letero estas longa. Rigardu!"

*Paŭlo.* "Jes, ni povos nun kisi. . ."

*Johanino.* "La leteron."

*Paŭlo.* "Ne, la bapto-patron."

*Johanino, rapidege skribante.* "Ni vin kisas kore, kara bapto-patro," *subskribante* "Johanino Delormel."

*Paŭlo, subskribante siavice.* "Paŭlo Delormel."

*Kun sopiro de ĝojo, jen! ĝi estas finita!*

*Johanino.* "Ni devas nur relegi nian evangelion."

*Paŭlo, post minuto da pripenso.* "Ho, ci volas diri nian epistolon!"

*Johanino.* "Jes, nian epistolon. Ni relegu ĝin!"

*Kaj ili relegis ĝin, ĝis la fino.*

*Johanino.* "Sed, ni forgesis ion."

*Paŭlo.* "Kio estas?"

*Johanino.* "Prezenti niajn bondezirojn je lia nomfesto."

*Paŭlo.* "Tio ĉi estas facile reparebla."

*Prenante la plumon, li aldonis post la subskriboj* "Johanino Delormel kaj Paŭlo Delormel kiuĵ deziras al vi bonan nomofeston."

## MONATO POST MONATO.

## MONTH BY MONTH.

Nur kelkaj tagoj post la ricevo de tiuj ĉi paĝoj, ni havos la plezuron renkonti unu la alian ĉe Boulogne sur Mer. Ni deziras sendi korajn bondezirojn, kaj esperojn, ke tiu ĉi *Unua Monda Kongreso Esperantu* estos por ĉiuj partoprenantoj tute plezuriga kunveno; ankaŭ ke la rezultatoj tie efektivigotaj inspiros nekontraŭstareblan fervoron inter niaj multelandaj kunbatalantoj. Ŝajnas al ni ja dezirinda afero, ke la lingvaj demandoj estu sub la gvido de ia *Internacia Komitato*, kompreneble sub la prezido de Doktoro Zamenhof mem. Por trafi tiun celon diversaj projektoj jam aperis, kaj ni varme konsilas ĉiun kongresanon, ke li tralegu la tre utilan libreton: *Kongresaj Projektoj ricevitaj antaŭ 15 Junio*, 32 pp., eldonata de la Grupo de Boulogne sur Mer.

\* \* \*

Niaj Francaj amikoj certe faradas ĉion eblan por sukcesigi la Kongreson, kaj, inter alioj, ni ricevis ekzempleron de la bonega *Kongresa Libro*, 163 pp., verkita de nia estimata kunverkanto S<sup>ro</sup> Paul Boulet. La volumo enhavas priskribon de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, frazlibreton Francan Esperantan, parkere lernotajn poemojn kiel *Espero* kaj *La Vojo*, ilustraĵojn kaj—ni ĝojas vidi—tre gravan aron da komercaj anoncoj. Tiu ĉi libro, pli ol ia alia ĝis nun eldonita, pravas ke la nuntempa komercisto fine vekigās je la graveco de Esperanto kiel komerca komprenilo. Ni esperas ke la antaŭemaj anoncintoj profitos pro ilia saĝeco.

\* \* \*

Tiun ĉi monaton ni ricevis la longe promesitan *Majstro Jan Hus*, bele presita 40-paĝa verko priskribante la *Vivo, Agado, Kondamno kaj Morto de la Glorinda Martiro*, verkita de J. F. Khun, kun antaŭparolo de Profesoro Carlo Bourlet. Kosto, 90 centimoj, de la *Presa Societo*, 33 rue Lacépède, Paris.

La *Vocabulario Esperanto-Español* alvenis antaŭ kelkaj tagoj, kaj estas la plej dika inter la ĝisnunaj vortaroj. Samforma kun la *Fundamenta Krestomatio*, ĝi enhavas 364 paĝojn, kaj la kosto (6 frankoj) certe ne estas tro granda.

*Esperanto* estas la titolo de la nova semajna foliego eldonita de S<sup>roj</sup> Berthelot & Lambert. Ĝi tute similas la ordinaran Francan ĉiu tag-jurnalon laŭ ĝia formo, kaj enhavas interesajn sciigojn pri la progreso de nia Afero. Oni anoncas ke ĝi vendiĝas ĉe ĉiuj stacidomaj gazetvendejoj en Francujo.

But a few days after the receipt of these pages, we shall have the pleasure of meeting in Boulogne. We desire to send hearty good wishes and the hope that this *First Esperantist World-Congress* will be for all participants a most pleasant gathering; also that the results there to be arrived at will inspire irresistible enthusiasm among our comrades of many lands. It seems to us most desirable that linguistic questions should be under the guidance of some *International Committee*, of course presided over by Dr. Zamenhof himself. To attain this end divers proposals have already appeared, and we warmly advise all Congress-men to read the most useful booklet: *Congress Projects received previous to June 15th*, 32 pp., published by the Groupe Espérantiste de Boulogne.

\* \* \*

Our French friends certainly intend to do all possible to promote the success of the Congress, and, among other things, we have received a copy of the excellent *Congress Book*, 163 pp., written by our esteemed collaborator, M. Paul Boulet. The volume contains a description of the town and surroundings, a French-Esperanto phrase-book, poems to be learned by rote, as *Espero* and *La Vojo*, illustrations, and—we rejoice to note—a most impressive collection of commercial advertisements. This book, more than any hitherto published, proves that the commercial man of to-day is at last awakening to the importance of Esperanto as a commercial medium. We hope the go-ahead advertisers will profit by their wisdom.

\* \* \*

We have this month received the long-promised *Master John Hus*, a finely printed 40-page work treating the *Life, Doings, Condemnation and Death of the Glorious Martyr*, written by J. F. Khun, with preface by Professor Carlo Bourlet. Cost, 10d., from the *Presa Societo*, 33 rue Lacépède, Paris, V.

The *Esperanto-Spanish Dictionary* arrived a few days gone, and is the most bulky of our present vocabularies. Uniform with the *Fundamento Krestomatio*, it contains 364 pages, and the price (5s.) is certainly not excessive.

*Esperanto* is the title of the new weekly sheet issued by MM. Berthelot and Lambert. In form it resembles the ordinary French Daily, and contains interesting information of our progress. It is stated that the paper is sold at all station book-stalls in France.

## PASKA LIBERTEMPO EN IRLANDO.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Le okazaĵoj de Paska libertempo kiun mi pasis kune kun amiko en Irlando dum la nuna jaro ofte estis tre ŝercadaj.

Oni estis tiel laŭdinta la belajn pejzaĝojn de Killarney ke ni decidis iri tien motorveturile de Dublin. La vetero estis belega, kvankam neĝis antaŭ kelkaj tagoj kaj eĉ tiam la suprojn de la montoj estis neĝ-kovritaj, ŝajniganta la kamparon tre pentrinda.

Vespere ni atingis Castle Dermot, kie estas granda ruiniĝinta abatejo kaj antikva Irlanda turo. Tiuj ĉi turoj estis konstruitaj ĉirkaŭ jaro 1013 kaj kvankam oni ne estas certa pri ilia originala uzado oni konjektas ke ili estis uzitaj kiel fortikaĵoj dum tumultoj, kaj ke ili ankaŭ enhavis la ĉefan sonorilegon de la monaĥejo. Sur la vojoj estis multaj belaj ruinaĵoj sed la plej interesaj kaj amuzigaj vidaĵoj estis la diversaj metodoj kiujn la vilaĝanoj uzas por preteririgi azenojn kaj mulojn preter la motorveturilo.

Kelkaj el la yeturigistoj senvestigis sin de la vestoj kaj ĝin pendis sur la kapo de la besto kaj aliaj ĉirkaŭprenis la azenon ĉirkaŭ la vizaĵo por kaŝi la okulojn, sed ofte la viroj estas multe pli timaj ol la azenoj.

Unufoje kiam ni alproksimiĝis malgrandan ŝarĝoveturilon la veturigisto (junulo de deksep jaroj) rapide elseliĝis, suprenrampis la defluilabordon, sin kaŝis malantaŭ la plektobarilo kaj nin rigardetis tra malgranda truo. Alian okazon virino subite perdis la nervon, faligis la kondukilojn, kovris la okulojn per la manoj kaj ekkomencis laŭte preĝi; dume la azeno daŭris marŝi trankvile.

Antikvistoj sin interesas multe pri la aro da ruinaĵoj sur la "Stonego de Cashel." Oni konjektas ke ili estis konstruitaj ĉirkaŭ jaro 1100 kaj multe el ili estas ornamigitaj de bela skulptaĵo.

Oni diras, ke antaŭ kelkaj jaroj partio da Amerikanoj tien vizitis kaj tiel ĉarmigis je la ruinaĵoj, ke ili deziris aĉeti kaj rekonstrui ilin ĉe granda Amerika ekspozicio. La Irlandanoj tamen rifuzis vendi, kaj la turistoj, farintaj multajn mezuraĵojn kaj fotografaĵojn, konstruis similajn ruinaĵojn (sed pli malgrandaj) en ilia lando.

La butikoj en tiuj ĉi malgrandaj urboj ne ofte havas logantan mienon. Ili enhavas preskaŭ ĉion—frukton, lardon, botojn, k.t.p., sed malfeliĉe pureco estas de dugrada graveco kaj la butikoj ŝajnas kvazaŭ la butikistoj havas grandan antipation kontraŭ sago kaj akvo.

En tago mi demandis de Irlanda sinjoro "Kial kelkaj urbetoj ŝajnas tiel malpuraj?" Li rigardis min dum minuton kaj ridinde respondis "La

Irlandanoj estas tre bonkoraj kaj se unu viro pentrus sian domon ĝi aperigus pli malpura la domon de sia najbaro, kaj por nevundi la sentojn de unu la alia, ili lasas aferojn por sin mem zorgi"; sed, li daŭrigis "La plej vera kaŭzo estas malfeliĉe ĉar ili ne amas laboron."

La du plej belaj ruinaĵoj sur la vojo estas la antikvaj abatejoj de "Kells" kaj "Holycross." Ili ambaŭ sidas sur riverbordo, kaj pro iliaj rebrilaĵoj en la akvo faras belegajn pentraĵojn. Holycross speciale posedas grandan fenestron bone konservitan. La priskribaĵoj kiujn oni legas pri Killarney estas neniel trograndigitaj; ĝi estas vere rava loko. Oni estas frapata de la luksa kreskado de la arboj kaj filikoj, eĉ la insuletoj en la lagoj estas kovritaj de kreskaĵo, kaj okaze oni ekvidas ardeon sin kaŝanta inter la kanoj. La kastelo de Ross kaj la abatejoj de Innisfallen kaj Muckross estas tute proksimaj.

Oni diras, ke preskaŭ ĉiam pluvas ĉe Killarney, kaj kiam mi demandis de boatisto "Ĉu ĝi estis prava?" Li respondis "Ho ne! certe ni havas kelkfoje tutan semajnon senpluva!"

Tie la hoteloj estas tre puraj kaj komfortaj ĉar tiom da turistoj vizitas la kvartalon, sed ofte la hoteloj en la malgrandaj urboj kie turistoj malofte loĝas ne klopodas multe pri pureco. Kelkfoje mi estas dorminta (ne tre komforte) sur tri seĝoj, anstataŭ la lito, ĉar la drapoj kaj lankovriloj ne min allogis; ili ankaŭ ŝajnis havi antipation kontraŭ la uzado de sago kaj akvo!

Estas mirinde kiaj negravaj aferoj kolektigas amason da homoj. Ĉu oni demandas scii la ĝustan vojon, aŭ ĉu oni deziras fotografi ion, dum malpli ol du minutoj, homoj kaj geinfanoj aperas kvazaŭ ili vere ekfalas el la nuboj. Ofte mi estas kalkulinta dudek, kaj kvankam ili ĉiam estas tre respektaj ili ne movos por petoj; anstataŭe ili daŭrigas tie stari kun malfermaj buŝoj, ĝis oni preskaŭ konjektas ke ili vidas per la buŝo.

Tamen la plej ridinda parto de nia hejma vojaĝo estis venonta. Veturante tre malrapide pro la ŝlimaj vojoj ni alvenis ĉirkaŭ ses mejlojn ekster Dublin kiam nia veturilo subite haltis kaj tute rifuzis sin movi aŭ antaŭe aŭ malantaŭe. Ni laŭte devigiĝis ĝin ŝovi al la plej proksima vilaĝo kie post multe da serĉado ni trovis viron kiu proponis ĝin tiri ĝis Dublin per sia ĉevalo. Sed Ho ve! la tielnomita ĉevalo ŝajnis kiel vivigata skeleto kaj la jungaĵo (farita de ŝnuregoj) ŝajnis kvazaŭ oni ilin estis uzinta por kunligi la ostojn. Tamen kiam ni estis pretaj foriri ĉiu vilaĝano amasis apude kaj multe amuziĝis je la vido.



Je la unua tiro la veturilo sin puŝis sur la postaj kruroj de la besto, sidigante lin preskaŭ sur genuojn de la maljuna viro, kiu veturigis. Sed baldaŭ ni ekiris, kaj la homoj sekvis ridegante kaj ŝercante.

Nia veturigisto rekonis multajn amikojn al kiuj li kiŝis la manon dirante ke "ili nun enviis lin ĉar li rajdis en veturilo kun kaŝitaj radoj." Sed kiam iu el la amaso diris ion, kio ne plaĉis al li, li metis la fingregon al la nazo kaj etendis la

fingrojn; samtempe konvene respondanta per la lingvo Irlanda."

Estis vere ridinda vidaĵo kaj estis nur kiam tiu ĉi stranga procesio atingis malgrandan interspacon ekster la vilaĝo ke la admiranta amaso disigis.

Bonŝance noktigis kiam ni atingis la finon de la vojaĝo alie nia ricevo eble estus estinta pli entuziasma ol plaĉa. Sed kvankam oni ofte ĉagreniĝas pro tiuj ĉi aferoj je la tempo mem ili pli amuziĝas kiam oni ilin pripensas poste.

## NOVA LIBRO PRI LA FRANCAĴOJ.

La celo de Esperanto—kia ĝi estas? Ĉu ĝi ne estas antaŭenigi inter popoloj pacon harmonian? Laŭ la poezio de nia althonorinda kaj aminda Majstro—

Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion:  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion!

Tial, ĉiu libro, kiu diras al ni pri la kutimoj kaj la karakterizaĵoj de la anoj de fremdaj landoj, estas ja leginda, speciale kiam ĝi estas ankaŭ simpatie verkita. Nu, la libron de Fraŭlino Betham-Edwards, titolitan *Home Life in France*, mi kore al vi rekomendas. Ne estas eble kaŝi la fakton ke, en la plimulto da Francaj romanoj aŭ noveloj, estas *io*, kiu estas certe iom malbongusta (laŭ niaj ideoj):—ofte tiu *io* estas kaŝita, kaj kredeble artiste-kaŝita—sed ĝi estas *tie!* Estas tre malfacile trovi novelon Francan kiu tute ne enhavas ion malĝentilan rilate al la seks-amo. Sed Fraŭlino Betham-Edwards al ni diras ke ni ne devas taksii la veran "Jacques Bonhomme" (Ĵaks Bon'om) por la kuranta literaturajaro de Francujo. Ni Anglanoj estas eble tro pretaj kondamni, kie ni ne tute komprenas. Ni ofte devas konfesi ke ni estas antaŭjuĝemaj.

Jacques Bonhomme (laŭ ĉi-tiu aŭtorino) ne estas Parizano nek eĉ Franca "John Hodge."<sup>1</sup> Li estas indecoplena antaŭ ĉio ajn; li ankaŭ estas lerta kaj antaŭvidema. Kulpojn li certe posedas, sed aliflanke li havas multajn ecojn, kiuj multe valoras en la hejmo kaj en la ŝtato.

Ni kelkfoje kredas ke neniu povas superi la Skotland-anon pri ŝpareco; sed efektive estas la Francanino pli ŝparema. La aŭtorino donas kelkajn anekdotojn amuzigajn pri tio.

Ofte en Angla societo ni aŭdas la opinionon ke la ĝentileco de la Francanoj nur estas supraĵa, kaj ke sub tiu ĝentileco ili ofte estas maldelikataj kaj vulgaraj. Tiaj ideoj nur el-montras realan nescion

pri niaj bonegaj najbaroj, kaj ni certigas ke tiuj, kiuj ĉeestos en la venonta Kongreso facile kaj volonte konfesos la eraron. "Estas en Francaĵo, kompreneble," skribas Fraŭlino Betham-Edwards, "animoj pli delikataj kaj pli maldelikataj, kiel alie; sed noto reganta<sup>2</sup> de la nacia karaktero estas ja ĉi-tiu delikateco. Multe da formoj en parolado kuranta, elmontras tion. Oni evitas malĝentilajn frazetojn, kaj oni moligas malagrablajn esprim-manierojn." Du galicismojn la aŭtorino lerte citas—unue, "une jolie laide" (beleta malbelulino) por kiu ni Angle ne posedas ŝufican tradukon, sed kiu signifas proksime "*a plain beauty*," kaj due, "il laisse à désirer" kiu Angle ni tre bone tradukas jene—"it leaves something to be desired" (io dezirinda mankas). "Ĉiu Francano havas iom da Rabelais, da Voltaire en sia karaktero," liris Fraŭlino Betham-Edwards, kiu citas tuj la historiojn pri la turmentegado de la Markizino de *Brinville*, la mortigo de la juna *De la Barre*, kaj la ekzekuto de la malbonega *Danton*. Eĉ la martiroj religiaj ŝercis en tiaj teruraj momentoj.

Kompreneble la Francanoj malkomprenis nin ĝuste kiel ni ilin malkomprenis: la cerboj kaj la animoj de la du nacioj estas ja tiel malsimilaj. Sed tamen ili nin kopiadis ĝuste kiel ni pri aliaj aferoj ilin imitadis. La Akademio Franca definitive permesis tiajn vortojn kiaj *bifsteck* (bifsteko), *rosbif* (bovaĵo rostita), *turf* (torfo), *jockey* (rajdisto), *macadam* (makadamo), *cottage* (dometo), kaj *square* (placo aŭ kvadrato). Kaj tuj kiam la Anglaj Kongresanoj alvenos en la Kongresejo, ili certe aŭdos "five-o'clock" (teo je la kvina) kaj "lunch" (tagmezomango), kvazaŭ tiuj estu vortoj Francaj!

La libro finiĝas per ĉapitro agrabla pri la "Entente Cordiale." Trae, la aŭtorino skribas tre simpatie kaj ĝentile kaj ni bonvolas libron kiu tiom helpas antaŭen plibonan sciecon pri niaj varmkoraj najbaroj. MARTYN WESTCOTT.

<sup>1</sup> La tipo de Angla kamparano. <sup>2</sup> i.e., "a dominant note." The expression is used in Harmony.

PRI LA MALSATO.  
 Originale verkita de E.W.

Mi estis deknjara knabino, kiam Cindran Merkredon onklino mia kun ŝia edzo, pastro, tagmanĝis ĉe mia patrino. Kompreneble la sola nutraĵo estis salsiŝo, ovsauĉo kaj terpomoj. Ili multe parolis pri la devo de la fasto, kaj pri la kuraĝo de kelkaj infanoj Turkaj kiuj dum varmega fasto tago sin detenis eĉ akvon trinki, kvankam ili tiel suferis ke pli ol unu el ili mortis pro soifo. Mi hontis ke mi, kristanino, superigis de nekredantidoj. Mi silente promesis ke dum la 40 tagoj de la granda fasto mi ne mangos viandon. Laŭe, Jaŭdon mi refuzis la viandon; tio plaĉis al mi ĉar mi ĉiam ĝin kontraŭvole manĝis, sed tio multe ĉagrenis mian flegistinon kiu estanta alireligiulino malamegis ĉiun kutimon Katolikan. Ŝi memorigis al mi antikvan ordonon kiun mi tute forgesis, nome ke ne manĝinte porcion fiksan de birdo aŭ de besto mi ne havos torton, pudington nek mem panon. Tial mi vere fastis. Vespere mi tre malsatis kaj volis multon manĝi, sed ŝi diris ke mi havos nur tiom kiom me ordinare deziris. Simila estis la morgaŭa matenmanĝo kaj la sekvantaj tagoj. Ĝis la kvara tago mi ne suferis, mi estis lerta, feliĉa kaj fiera pri mia obstineco; ankaŭ mi kredis ke mia patro estos fiera pri mia elteno, kiam en la granda Juĝatago li ĉion scios. Poste mi grade perdis apetiton kaj mi ofte ne manĝis eĉ la malgrandan pecon da pano kun sukeraĵo al mi donitan por vespermanĝo. Mi devas konfesi ke pli ol ian frandaĵon mi ŝatis la vidon de la ĉagreno de mia flegistino kiun mi tute neamatis, ŝi estis la unua Anglino kiun mi konis, kaj nur post jaroj mi lernis estimi aŭ ami la geanglojn. Mia unua sufero estas ke mi preskaŭ perdis la memoron; la ok aŭ dek lecionojn kiujn mi vespere per granda peno lernis parkere mi nokte forgesis, kaj morgaŭe, tempo al mi mankis ilin relerni, tial ke miaj bonaj instruistinoj koleriĝis kontraŭ mi kaj min devigis plie lerni multe da paĝoj kaj elskribi predikon. Mia dua sufero estas en la okuloj, tage mi malbone vidis kaj nokte mi ofte vekigis per subitaj akraj doloroj, la palpebroj tiel rigidigis ke iasofo al mi estas necese uzi fingron por ilia fermo aŭ malfermo. Al neniu mi plendis ĉar mia avo estis terure malsana, la kuracistoj ne havis esperon je lia vivo: mia patrino estas ĉe li de frumateno ĝis vespero, mia onklino de vespero ĝis mateno, kaj reveninte en iliajn domojn ili estas tiel lacaj kaj malĝojaj ke estus krome aŭ la unu aŭ alian maltrankviligi. "Nia Fraŭlino" min antaŭe instruis ke estas malnoble iun dolorigi, mem fremdulon, ke estas eĉ pli malnoble ne povi silente suferi. Poste mia avo

formoviĝis al ĉefurbo kaj mia patrino lin akompanis—nune mi ne havis parkerajn lecionojn, mia instruistino pensis ke mia cerbo tro estis klopdinta kaj ke mi iĝas idiota. Mi iris en la lernejo sed mi nur aŭskultis; pli ofte mi kusigis sur la tero. Enfine mi komencis senti severajn dolorojn internajn kaj tiam unue min frapis la ideo ke mia malsaneco devenis el malnutro. Mi kredis min mortontan kaj mi pensis kiel feliĉa kaj fiera estos mia Patro kiam Li min vidos forlasi la gloran benitan suferantaron pro Lia amo, por stari eterne apud Li en loko malpli honorinda. Foje mi pensis ke eble Li ja mortis pro Lia religio kaj ke Dio min faris fasti por ke mi apud mia Patro en ĉielo vivu. Baldaŭ mi memoris ke mi fastis ne por plaĉi al Dio sed por superi infanojn Turkajn, kaj ankaŭ ke la superemo estas peko. Turmentata de tiuj ĉi pensoj kontraŭaj mi ne povis preskaŭ pli dormi.

Malfrue unu vesperon mia patrino hejmen ne venis, morgaŭe min vidante ŝi ektemris kaj tuj sendis inviti nian kuraĉiston nin viziti, sed antaŭ lia alveno mi dufoje svenis. Mi ne memoris kiom da tagoj daŭris mia memvola fasto sed bone mi memoras ke la Paska festo finiĝis kaj mi ne ankoraŭ povis kuri, ludi aŭ engluti nutraĵon malfluidan.

Neniam mi bedaŭris tiun ĉi mian sperton ĉar pli malfrue ĝi profitis al mi kaj al aliaj. Mi estis lerninta vidi la malsaton kaj kompreni ĝiajn efikojn.

Unu Dimanĉon en la lernejo mi ekvidis blondan okjaran knabinon kiu dormis: la kapo kusigis sur benko, sed la palpebroj nur duone fermiĝis, kiam oni ŝin vekis mi vidis ke ŝi uzis fingrojn por ilin levi kaj mi certigis ke ŝi ne havas sufiĉan nutraĵon. Post du tajoj en komitata kunveno mi parolis pri la knabineto; la anoj min mokis dirante ke ŝia patrino estas tute ne malriĉa kaj loĝas en dometo beleta. Mi persistis kaj enfine bonkora magistrato je mi kredis. Li ĝentile sin sciigis pri la aferoj de la vidvino kaj eltrovis ke, perdinta preskaŭ tutan ŝian riĉecon kaj vendinta argentaĵojn kaj juvelojn ŝi nune limigas al ŝi kaj al ŝia filino por povi gardi ilian dometon; per lia influo la vidvino ricevis pension kiu ŝin ebligis komforte vivadi.

Instruante muzikon al juna kamplaboristo kiu volis helpi al lia fratino (la organistino de vilaĝa preĝejo); mi vidis motojn spasmajn de la manoj. Mi do zorgo rigardis lian vizaĝon kaj vidis la duonfermitajn okulojn. Tiam mi estis juna kaj tre vivega, mi ekkriis "Kiamaniere vi forĵetis vian monon por ke vi ne havas sufiĉajn manĝaĵojn?"

Li ruĝiĝis, paliĝis kaj ekploregis. Kun iom da moko li konfesis ke li penadas ŝpari antaŭ la fino de jaro sufiĉon da mono por fari metilernanton lian frateton kiu ne havas la sanecon necesan por terlaboro. Sekve amikino mia pruntis la monon kiu en du jaroj dankeme repagiĝis.

Mi esperas ke, legante mian tute ne tro-grandigitan rakonton, iuj, kiuj malsaton neniam suferis, lernos kompati la malsatulojn kaj precipe la milojn da senhelpaj infanoj, mem da infanetoj kiuj tagon post tago devas iri, malvarmaj malsataj, nevestitaj en lernejojn kie ili pro lacecon, dormemon kaj doloron tute ne povas ion lerni.

Ĉu ne estas terure, ke en lando riĉa kaj civilizita

tia tormento vizitas la plej senkulpajn la plej senhelpajn de la loĝantoj? Ĉu ne estas terurige ke en lando kristana infanoj kruele malsatas kaj subpremiĝas? Ĉu Kristo ne benis per beno speciala tiujn ĉi liajn estaĵetojn?

Antaŭ tri jaroj la Londona Vegetara Societo komencis donaci al kelkaj el la plej malriĉaj gelernejoj sufiĉan kaj nutran manĝon kies kosto estis nur unu penco. Dum la tri vintroj 400,000 de tiaj manĝoj donaciĝis en Londono.

Miss F. I. Nicholson ĝoje respondos al demandoj adresitaj al "Secretary of Children's Dinner Fund," Memorial Hall, Farrington Street, E.C.

## LA GRIZA ĈEVALO.

Tradukita de F. E. Bearne.

Viro, kiu konis la mondon, unu tagon donis al sia filo du ĉevalojn, veturilon, kaj korbon da ovoĵ.

"Iru," li diris al la knabo, "vojaĝu sur la ĉefvojoj ĝis kiam vi venos al la unua domo kie loĝas geedzoj. Se vi trovos, ke la edzo estas la majstro tie, donu al li unu el la ĉevaloj. Sed, kontraŭe, se la edzino regas, donu al ŝi ovon. Revenu tuj, se vi fordonis ĉevalon sed ne revenu se vi retenis la ĉevalojn kaj unu ovo restas."

La knabo forveturis kaj baldaŭ alvenis dometon, eliris el la veturilo kaj frapis la pordon. La edzino malfermis ĝin, kaj lin salutis.

"Ĉu via edzo estas ĉe si?" li demandis.

"Ne, li laboras kampe," ŝi respondis; "sed mi alvokos lin."

Li alvenis, viŝante la frunton.

La juna viro diris al ili la aferon.

"Nu," diris la edzino, "mi ĉiam faras tion kion volas mia edzo. Vi estas mia majstro, ne vere, Joĉjo?"

"Jes, nature!" li respondis.

"Bone," diris la knabo, "mi do devas doni al vi ĉevalon. Kiun vi elektos?"

"Mi pensas," diris Johano, "ke ni prenos la ĉevalon blankan, se ni havas la elekton."

"Mi pensas, ke ni prenos la grizan, ĝi estas la pli bona," diris la edzino.

"Ne," diris Johano, "la blanka por mi, li kuras bone."

"Ne!" diris la edzino, "mi ne tiel pensas la griza estas pli bona. Mi ne estos kontenta ĝis kiam mi havos tiun ĉi."

"Nu, se via volo estas tiel, mi ne plu kontraŭbatalos ĝin. Ni prenu la grizan ĉevalon!"

"Mi dankas vin," respondis la knabo. "Permesu ke mi donu al vi ovon anstataŭe, el tiu ĉi korbo!"

## JUNA FINANCIŜTO.

Du knaboj, dezirante pasigi gajan libertempon, trovis ke ilia tuta riĉeco estas 2 pencoj. Tiu ĉi sumo, ili pensis, ne estos sufiĉa. Ili kuniris hejmen kie unu el la junuletoj demetis sian pantalonon. Lia kamarado portis ĝin al prunt-oficejo kaj ricevis 2 ŝilingojn. Poste li iris al meblarejo kaj dungis horloĝon po 2 ŝilingoj monate, paganta la unuan partpagon. Tiam li marŝis al alia prunt oficejo, lasis la horloĝon tie, kaj ricevis 25 ŝilingojn. Rapide li kuris al la unua prunt oficejo, repagis la monon prunte donitan kaj ree ricevis la pantolonon, kiun li realportis al sia kunulo.

Kune elirantaj el la domo, policano arestis la spekulaciiston kaj alkondukis lin al malliberejo. La postan matenon li aperis antaŭ magistrato, kulpigita vendinte artikolon dungitan. Sed leĝisto opiniis ke la knabo ne estas kulpa, ĉar li ne vendis la horloĝon sed nur pruntis ĝin. Senkulpigo sekvis.

Tiam la ruzplena knabo faris proceson kontraŭ la meblisto pro maljusta malliberigo, kaj gajnis rekompencan po 50 libroj.

GEO. C. LAW.

## SAVITA DE MORTO.

Originale verkita de Generalo George Cox.

## ĈAPITRO III.

“Ĉu vi iam verkis romanon?” diris la maljuna sinjoro, vekigante subite el sia dormetado. Mi nomas liu “maljuna sinjoro,” pro tio, ke li ne diris al ni sian nomon dum nia vespermanĝa interparolado.

“Ne, mi neniam revis pri tia afero,” mi respondis, ridetante, sed tamen iomete surprizita je lia subita demando. “Ĉu vi estas verkinta unu?”

“Mi verkis du aŭ tri librojn pri miaj vojaĝoj,” li respondis; “sed mia ambicio estas produkti plenekscitegan romanon kun mirindega fundamento, sed jen mia malfacilaĵo; mi ne povas elpensi tian fundamenton!”

“Kiam mi rememoras la fabelojn kiujn vi rakontis al ni dum la vespermanĝo mi estus pensinta, ke tio estos facila afero.”

“Ha! eble vi tiel pensas,” diras la maljunulo, “sed neniom da miaj aventuroj, strangaj kiel estas kelkaj el ili, povis fondi efektivan bonan fundamenton, pri rabado, falsaĵo, memmortigo, mortigo, k.t.p. Sed, parolante pri mortigoj, ĉu mi ne aŭdis vin diri al via frato iom pri revolvero kiun vi aĉetis?”

“Tre eble vi aŭdis,” mi respondis. “Mi aĉetis unu hodiaŭ matene, kaj ĝin havas kun mi en la vagono. Ĉu vi estas juĝanto pri tiaj armiletoj?”

“Nu, mi ne povas nun diri ke jes; ĉar mi ne vidis iajn da la plej novaj elpensajoj, sed mi estas manpreninta sufiĉe multajn dum miaj plijunaj tagoj, kaj ilin trovinta tre utilaj kunuloj en kelkaj lokoj. Mi estis pensanta aĉeti unu por Vilĉjo. Ĉu ĝenus vin montri al mi la vian?”

“Tute ne,” mi respondas, deprenante de la breto pistolujon, kaj malligante la ŝnureton de la paketo. “Nu! kien do mi metis la ŝlosilon?” Ho! mi memoras, neligate en unu el miaj poŝoj,” mi daŭrigis. Kaj elprenante nombron da aĵetoj el mia poŝo kaj metante ilin sur la kontraŭan sidejon apud la maljuna sinjoro, mi fine trovas la ŝlosilon kaj malŝlosas la skatolon.

“Mi devas surmeti la okulvitrojn,” diras la maljunulo, “ĉar la lumo de tiu ĉi lampo ne estas kiel eble plej bona”; kaj, konvenante la agon kun la parolo, li enmetis la manon en la flankpoŝon de sia vesto, sed eltirante ĝin, lia monujo falis sur la plankon de la vagono. “Per Jovo! mi devas zorgi pri tiu!” li diras ridante, samtempe mallevigante kaj ekkaptante la monujon, kiun li metis sur la sidejon apud li. Tiam, almetante la okulvitrojn, li prenis la pistolujon el miaj manoj, kaj

komencis ekzameni ĝian enhavon. “Tre utila, beleta kaj tuta,” li daŭrigis, elprenante la pistolon, “la skatolo ŝajnas enhavi ĉiun necesajon, kaj ankaŭ duojn da ĉiuj partoj kiuj povas eble malordigi. Kiel vi ĝin ŝargas?”

“Ho! tute facile!” mi respondis. “Premu la risorton ĉe la flanko, kaj la ŝargujo elfalos; tiam oni povas momente enmeti la kartoĉojn; repuŝu la ŝargujon en ĝian lokon kaj ĝi alligiĝas per si mem. La pistolo ankaŭ havas riglilon, kiu ŝlosas la tirilon, por ke ĝi estu sendanĝere portata en la poŝo. Ĝi ŝajnas al mi esti lerta elpensajo. Kion vi pensas pri ĝi?”

“Ĝi estas multe pli oportuna ol tiuj farataj kiam mi estis junulo,” li diris, enmetante du aŭ tri kartoĉojn en la kartoĉingojn, kaj remetante ĝin.

Rigardinte la turn-pafileton kelke da momentoj, la maljunulo subite faligis la manojn sur siajn genuojn, kaj ŝajnis esti perdata en pensado.

“Hura! brave!” li ekkriis post paŭzo, “la ĝustajo! Kia belega fundamento! Atendu momenton ĝis mi ĝin elverkos.”

Efektive mi ekpensis, ke mia kunulo estas freneza, ĉar tie li sidis, rigardegante rekte antaŭen, kaj tute senmova.

Post intertempo da kelkaj minutoj, li ekparoladis al si mem—“Jes, tio estas . . . ne, tio ne bona, li povis eltiri ĝi el ĝi, kaj pruvi . . . ne, li ne povis, ĉar kiel li povis montri . . . jes, li povis, ĉar sia frato eble . . . ne, ĉar la hotelportisto . . . jes, estas tute prave kaj fareble.”

“Atentu! aŭskultu!” subite li diris, rigardante min, sia vizaĝo radianta pro ekscitego. “Ĉu tiu ĉi ne estas efektive belega kaj tremiga fundamento por romano? Aŭskultu dum mi rapide skizas la ĉefokazaĵojn—Mi renkontas vin kaj vian fraton en hotelo—ni estas nekonataj—mi, en la apudesto de la hotelportisto, sciigas vin, ke mi havas en mia monujo tricent livran bankbileton—Ni, vi kaj mi, forveturas sole en la sama vagono al Brighton—Vi kunhavas turn-pafileton, kaj vi ĝin montras al mi—Nu, kiel do vi povis iel pruvi, ke vi ne estis mortiginta min, supozinte, ke mi” . . . (tie ĉi la maljuna sinjoro komencas ĉirkaŭsvingi la pistolon, kaj tiom ekscitiĝi, ke mi ekkriis:—

“Por amo de Dio, memoru ke la pistolo estas ŝargita!”

“Ne timu,” daŭrigis li, ridante, “supoze, ke mi ĝin ŝargu, kaj okaze mortigu min.” . . .

Krakego! . . . Kriego! . . . Kaj la vagono pleniĝas de fumo! Mi falas sur la sidejon,

defrapata de teruro, kaj tute nekapabla doni al la mafeliĉulo la plej malgrandan helpon, ĝis kiam mi estas vekata de lia voĉo:—

“Rapide! . . . paperon kaj krajonon!” “*Ĉu vi ne vidas ke vi estas mortonto, se mi ne skribe atestas ke mi pafis min mem hazarde?*”

Mehanike mi elŝiras folion el mia poŝlibro kaj ĝin donas al li kune kun kraĵono. La fumo grade malaperas, la vagono pliheliĝas, kaj mi vidas la malfeliĉulon sidantan sur la kontraŭa sidejo, kun lia kapo apogata sur lia maldekstra mano tra kies fingroj malrapide tragutetas la sango.

“Subtenaĵon por la papero!” li spiregas.

Mi metas la skatolon de la fatala revolvero sur liajn genuojn, kaj tenas la paperon dum li skribas per mano tremanta: “*Sciante ke mi havas nur*

*malmultajn minutojn por vivi, mi solene konstatas, ke mi okaze pafmortigis min dum mi ekzamenadis turn-pafilon apartenantan al Sinjoro . . .*”

“Kio esta via nomo?” li preskaŭ neaŭdeble demandas.

Antaŭ ol mi povas respondi, la kraĵono ekfaletas el lia mano, kaj lia kapo falas antaŭen super la paperon.

Mi suprenlevas lin, sed terura tremetado ekkaptas lian korpon, kaj mi ekvidas ke liaj lastaj momentaj estas alvenontaj. Li penas paroli sed la vortoj mortas sur la lipoj. Li almontras al la papero, kiu kuŝadas sur la planko; lia kapo falas malantaŭen; unu lasta elspiraĵo, kaj li trapasas la limon!

(*Daŭrigota*).

## PRI BRAILLE VORTARO.

STOCKHOLM.

ESTIMATA SINJORO,

Sendube vi aŭdis per “*Lingvo Internacia*” pri la ĝenerala situacio de Esperanto ĉe la blindularo. Vi aŭdis pri la sindona, senlaca laboro de Sinjoro Th. Cart; pri lia kreado unue de gramatiketo kaj ekcercaro Esperantaj en *Braille* kaj due de revueto al ni legebla, kiu jam estas amata; vi aŭdis pri la loterio de Fraŭlino Zabylon d’Her—la malegoista, kuraĝa virino—kiu celas progresigi Esperanton ĉe la blindularo; kaj vi aŭdis, kiel unu post alia el niaj samsortanoj aliĝas al nia deo.

Mi tial volas tie ĉi nur iom rakonti pri Esperanto ĉe la Angla blindularo. Ĉar dank’ al la gramatiketo de Prof. Cart, tradukita bonege de S<sup>ro</sup> Joseph Rhodes, Esperanto estas ankaŭ lernebla al blindaj Angloj, se ili havas bonan scion de la gramatiko de sia patrinlingvo. Ne malmulte estas jam farite por Anglaj blindaj Esperantistoj: La *Braille’a* gazeto “*Progress*” ofte enhavas artikolojn kaj sciigojn pri Esperantaj aferoj, el kiuj multajn skribis nia amiko Sinjoro W. Percy Merrick. Tamen Esperanto ne havas grandan nombron da amikoj ĉe Anglaj blinduloj. Tio ĉi dependas eble

je pli ol unu cirkonstanco sed ĉefe je la fakto, ke ekzistas neniam Esperantaj vortaroj en punktskribo. Mi aŭdis tion ĉi el diversaj flankoj, kaj en la Aprila numero de “*Progress*” tio sama estis denove elmontrata. Kelkaj Svedaj amikoj tiam decidis fari ĉion en siaj fortoj por helpi al siaj Anglaj kungefratoj. Kvardek Kronoj estis tuj donataj. Tio ĉi estas malgranda sumo, sed ĝi estas komenco de fariĝonta fondo por Esperant-Angla vortaro *Braille’a*. Kaj neniam fino sen komenco.

Nia plano estas kolekti sufiĉan sumon por ebligi la presadon de la libro nomita. Unu aŭ du Angloj jam promesis sian helpon. Dume ni priesploradas, kie la vortaro devas esti presata por fariĝi sufiĉe malmulte-kosta.

Mi skribis al vi tiun ĉi leteron, parte ĉar mi scias, ke ni havas vian afablan intereson, parte ĉar mi pensis, ke eble iuj el viaj Legantoj volus helpi al ni iamaniere. Mi estus tial al vi tre danka, se vi volus fari resumeton de mia letero kaj presigi ĝin en via estimata gazeto.

Kun granda respekto,

Mi estas, kara sinjoro,

Via fidele,

H. J. E. THILANDER.

## POPOLA VERSAĴO.

Tradukita de A. Simon (Frankfurt a/Main).

Pro manko de najlo, la ŝuo perdiĝis.

Pro manko de ŝuo, ĉevalo perdiĝis.

Pro manko de ĉevalo, rajdisto perdiĝis.

Pro manko de rajdisto, batalo perdiĝis.

Pro manko de batalo, reĝlando perdiĝis.

Kaj ĉio pro manko de ĉevalo-ŝu-najlo.

## AVENTURO TERURA.

Originale verkita de William Officer (Peterhead).

Estis mia libertempo. Severa laborado dum tuta jaro estis min malfortiginta. Mi konkludis ke resaniga maraero estus la plej bona kuracilo. Sekve mi min trovis loĝanta ĉe vilaĝo apud la Skota marbordo.

Ĉiutage mi promenadis sur la bordsablaroj, traĉe ĝuadante la freŝan aeron kaj sunbrilon.

Unu matenon mi rimarkis ŝtonegaron, foretendantan en la maron. Mi ankaŭ rimarkis ke la ŝtonegoj plialtiĝis kiel ili malproksimiĝis de la tero. Ĉe ambaŭ flankoj de la rifo la ondetoj saltis kaj ludis simile al feliĉaj kreitaĵoj vivaj.

Kia bonega ekzerco estus, mi pensis, transpasi la ŝtonegojn, kaj sidiĝi sur la plej malproksima pinto. Subite deziro anstataŭis penson, kaj mi komencis la allogan eksperimenton.

Mi supreniris kaj malsupreniris ŝtonegajn montetojn, kaj trapasis ŝtonegajn valetojn, ofte je granda malfacilo. Fine, mi trafis mian celon, kaj sidiĝis triumfe sur la lasta ŝtonego.

La varmo kaj marmuziko kombinis min luli en feliĉan revaĵon.

Kiel longe mi tie sidadis mi ne povas diri. Mi vekigis trovi ke la marfluo estis multege leviginta.

"Mia Dio! Ĉu estos eble retrapasi la ŝtonegajn valetojn?" estis mia unua penso. Je timego mi tuj levigis. Unu ekvido preskaŭ haltigis mian koron. La plej proksima valeteto similis riveron, kiun oni ne povus transpasi krom per naĝado. Malfeliĉe, mi ne estis la arton lerninta. Sopire mi rigardis la teron, nur esti memorigata cirkonstancon, kiu alportis novan teruron al mia animo. Antaŭ nelonge mi preterpasis tiun ĉi saman lokon. La marfluo estis tiam alta; kaj la ŝtonegoj sur kiuj mi nun staris ne estis videblaj.

Kia malgaja sorto devos do esti la mia, se helpo ne alvenos! Rilate al tio ĉi lasta mi havis malmulte da espero. Tiu parto de la marbordo estis dezerta, kaj homoj ĝin vizitis tre malofte.

La ondoj jam alproksimiĝis miajn piedojn. Mi ilin rigardis kun malvarma tremeto. Antaŭ nelonge ili aperis belaj, sendanĝeraj. Nun ili ŝajnis alpreni la formojn de sovaĝaj monstroj, kiuj penas min ekkapti per teruraj blankaj dentoj.

Priskribi la sentojn, la teruraĵojn kiuj min posedis dum la kruela akvo levigis colo post colo ĉirkaŭ mi, ne estas eble. Por tia tasko la homa lingvo ne estas sufiĉa. En la daŭro de tiu mallonga periodo mi ŝajnis morti milfoje.

Kiam la akvo atingis mĵau bruston, tre stranga afero okazis. Miaj timoj subite foriris; kaj mia animo tute trankviligis. Ankoraŭ mi rigardis la teron; sed mi ne plu atendis helpon, nek eĉ ĝin deziris.

Baldaŭ nur malfacile mi povis stari. Ĉiu ondo, kiam ĝi preterpasis, preskaŭ min forportis. Fine, miaj piedoj apartiĝis de la ŝtonego. Mi aŭdis laŭtan siblan sonon en miaj oreloj, kaj nenion plu sciis.

Kiam mi vekigis mi kuŝis en boato. Apude du fiŝkaptistoj genufleksis.

Al miaj demandoj ili respondis ke ili vidis mian danĝeran situacion de la maro, kaj rapidis min ŝavi. Ili alvenis ĵus kiam mi subakvigis, tuj min tiris en la boaton, kaj, post multe da flego, mian konsciecon revenigis.

Tiu ĉi aventuro okazis antaŭ multe da jaroj; sed ĝi lasis tian profundan impreson sur mia animo ke mi ne povas eĉ nune rigardi la maron sen tremeto.

## LA MALJUNA PASTRO.

En kampa vilaĝo de la okcidenta Irlando, Katolika Pastro sufiĉe maljuna por esti iom malpreciza je sia memoro, predikis unu dimanĉon pri la Komparaĵo de la bulkegoj kaj fiŝoj: li signalis al sia zorgitaro kia miraklo estis kiun faris Nia Sinjoro kiam li nutris kvin virojn kaj du virinojn per miloj da bulkegoj kaj miloj da fiŝoj: kaj postulis ĉu iuj el liaj aŭdantoj kredas ke ili povas simile fari. Ŝajnis ja al la parohanoj ke ne estas tie ia granda miraklo; kaj unu, Pat Rafferty, estis sufiĉe maltima por eldiri ke "Mi kredas ke mi do povus tiom fari mi mem!"

Tio ĉi, kaj lia memoramanko alvenis al la oreloj de la Pastro, kiu vidis sian eraron, kaj, kun humora okulbrileto, diris, "Ho! mi ja tion plene rektigos proksiman dimanĉon!" Nu, kiam alvenis dimanĉo, li klarigis al sia aŭdantaro kiel li devus diri ke Nia Sinjoro nutris milojn da viroj kaj milojn da virinoj per kvin bulkegoj kaj du fiŝoj. "Nun," li demandis, "Pat Rafferty, ĉu vi kredas, ke vi povus tion fari?" "Vere, via moŝto riverenca," respondis Pat, "mi ja kredas ke jes." "Kaj kiel vi farus?" reparolis la Pastro. "Nu! via Riverenco, per la restaĵoj de la lasta Dimanĉo!"—(10532).

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- 1/4 Issues: 1/2 roubles: 10 cents.

Wholesale Agents: H. Huter, Temple, London, W.C.

All Communications should be sent to THE EDITOR, 47, Kensington Gardens Square, London, W.

## CONTENTS.

|  | Page |
|--|------|
| Two Curious Problems .. .. .   | 109  |
| TRANSLATIONS OF THE "GARDENS" (L.B.M.)                                     | 120  |
| NOTES ON THE GRAMMAR, Part II. (Col.<br>H. K. Gordon) .. .. .              | 126  |
| SEVEN MORE DEARS. Serial continued<br>from page 98 Vol 190 (Gougenl. Cor.) | 138  |
| REAGENCIJONO, Part IX. (Edward<br>Mouffe, M.A., Oxon) .. .. .              | 147  |
| ESPERANTO: HEROJO (Translated by C.<br>Larosa) .. .. .                     | 150  |
| THE "GARDENS" PARTS: (H. K.<br>Gordon) .. .. .                             | 150  |
| THE "GARDENS" (Continued Internally)                                       | 151  |
| GRAMMAR NOTES .. .. .  | 154  |
| WORDS, THE DERIVATION OF WHICH<br>WAS NOT BY U. (Larosa) .. .. .           | 157  |
| THE LITTLE DEAR (Continued by H.<br>Larosa) .. .. .                        | 161  |

REGISTERED DESIGN.  
No. 1202

## VISKO ESPERANTO.

Registered Trade Mark No. 870,948.

DOŬERA PROPAGANDILO  
Observo de Viskojo (Kaj la  
Internacia Esperanto) sur la alioj.  
Amisajligilo (manligilo) Esperanto  
Internacia (manligilo) Esperanto.

BUCHANAN, SCOTT & CO.,  
Gartland Street, Glasgow,  
Scotland.

# The Remington

## THE UNIVERSAL TYPEWRITER.

Just think of it!  
THE INTERNATIONAL MACHINE.

Exploited by love of nationality,  
The machine is loved by men of all civilized peoples.

Write Remingtons: you are guaranteed speed and  
durability.

THE REMINGTON TYPEWRITER COMPANY,  
185, Greenwood St., London, E.C.

# La Remington

## LA UNIVERSAL SKRIBMASIN.

Triguenu je Ho!  
LA INTERNACIA MAŜINO.

Tuŝi Skribaĵoj de ĉiuj lingvoj.  
La Skribaĵoj estas per ĉiuj civilizitaj popoloj.

La Remingtonoj estas garantitaj rapideco  
kaj daŭrinduro.

LA REMINGTON TYPEWRITER COMPANY  
185 Greenwood St., London, E.C.

## ĈIU, NI FOVAS PARADIZON IRL.

|                        |                         |
|------------------------|-------------------------|
| The best of things     | The best of people      |
| The best of times      | The best of places      |
| The best of seasons    | Paradise on earth       |
| The best of countries  | The best of things      |
| The best of all things | It is paradise on earth |

See it all and more in our new book, "The Paradise on Earth"  
See it all in our new book, "The Paradise on Earth".

## The "Review of Reviews"

Is the Best Magazine for Many People  
And it is read by "Esperanto" Students.

The aim of this Magazine is to make the best thoughts of  
the best writers universally accessible as a "Library" book.  
The journal and papers of the community are here also  
with intelligent interest the great international "Library" history.

Post Free for Twelve Months, 2s.  
10 G. 70-11, St. 100, London.

Order: HOWELL HOOKS, NORFOLK ST., LONDON.

## NASKIĜO.

Al la Honorigoj H. R. Dyonis, Northumber-  
land House, Duxon, je Junio 17, 1910 (septem-  
centa Frederick Linnard).

## KOLEKTANTOJ.

Finnlandaj postmarkoj, 20 markoj, sendita  
per unu 50 paŝoj (1/2, ad 2 fr 25 c.), 20 mar-  
kaj postmarkoj per unu (2/0, ad 2 fr 75 c.). (Sed vi  
sendi per postmarkoj, tiuj postmarkoj  
akceptas la efektiva valoro.)

ORDON: HONORIGOJ, DUXON, NORTHUMBERLAND, ENGLAND.

## Correspondence Lessons in Esperanto

185 GREENWOOD ST.

MR. E. MOTTBAU, Honorary Secretary of Esperanto  
107, Northway Street, Fincham,  
17th Ave. London, E.

## AL STUDENTOJ ĜIVLANDAJ

Studentoj de ĉiuj landoj kiuj volas lerni Esperanto  
la London University estas invitataj, aliaj 20  
4 aliaj studentoj, kiuj volas lerni Esperanto  
UNIVERSITY ESPERANTO SOCIETY.

ORDON: HONORIGOJ, DUXON, NORTHUMBERLAND, ENGLAND.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korepondecojn.

Edino, L. FRANK, 17, Somerset Street, Kingsdown, Dover, Kent. (Ordonoj per ĉiuj lingvoj  
per redakta koficejo & filialoj.)

Mr. G. WILSON, 95, Greenwood Road, Dalston, London. (Ordonoj per ĉiuj lingvoj  
per redakta koficejo & filialoj.)

La Kanto de la Esprito estas 54. (Tio postmarkoj.)



# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bolingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Bro. T. Cajka, Bystrica Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Myba, 88, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

23. [Vol. II., No. 9.]

SEPTEMBRO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## PROGRAMOJ.

*Sabato, Aŭgusto 5.*

1. L'Espero. *Ĥoro* de Boulognaninoj.
2. Oficialaj Paroladoj.
3. Respondo de D<sup>ro</sup> Zamenhof.
4. Orĥestro.
5. Ĉu vi konas la landon? *Kanto*. F<sup>ino</sup> M. Samuel.
6. Serenado. *Kanto* F<sup>ino</sup> Richard, *Violono* F<sup>ino</sup> Libersat.
7. Sub la blanka velo. *Ĥoro & solo* de S<sup>ino</sup> Parsons.
8. La Bano de la Pastro. *Monologo* de Paul Boulet.
9. La Edziniĝo de Johanino. *Kanto*. S<sup>ino</sup> Duchochois.
10. Hinda *Kanto*. *Voĉo* S<sup>ino</sup> Bergier, *Violono* F<sup>ino</sup> Libersat, *Violonĉelo* S<sup>ro</sup> Libersat.
11. Mensogo pro Amo. *Unuakta komedio* tradukita de Paul Boulet, *Ludata* de F<sup>ino</sup> Pannevin & Samuel. S<sup>roj</sup> Lephay, Boulet, C. Michaux, Martin & Samuel.

*Dimanĉo, Aŭgusto 6.*

1. L'Espero. *Kanto* S<sup>ino</sup> Guivy (Tours).  
<sup>1</sup>Ho Mia Kor'. *Kanto* S<sup>ino</sup> Guivy (Tours).
2. Balo de la Enmaskigitoj. *Deklamata* de S<sup>ro</sup> Lambert (Londono).
3. Legendo. *Ludata sur Violono* de F<sup>ino</sup> Birch (Folkestone).
4. Finokanto. *Kanto* de D<sup>ro</sup> Hanauer (Frankfurt).
5. Ĉu esti aŭ ne esti. *El Hamleto*. F<sup>ino</sup> Schafer (Londono).
6. Plu kreskis la Barbo. *Humora kanto* de S<sup>ro</sup> Hulme (Shrewsbury).

7. Edziĝo Kontraŭvola, de Molière, tradukita de Victor Dufautrel.

Dorimeno, *filino de Alkantoro*. S<sup>ino</sup> Junck (Italujo).

Unua Ciganino. F<sup>ino</sup> Cederblad (Svedujo).

Dua Ciganino. S<sup>ino</sup> Avilov (Rusujo).

Sganarelo, *amanto de Dorimeno*. S<sup>ro</sup> Paul Boulet (Francujo).

Pankraso, *Filozofo*. S<sup>ro</sup> H. Bolingbroke Mudie (Anglo).

Mariufuso, *Filozofo*. S<sup>ro</sup> Saint Martin (Kanado).

Geronimo, *amiko de Sganarelo*. S<sup>ro</sup> J. Ansel (Francujo).

Alkantoro, *patro de Dorimeno*. S<sup>ro</sup> Cogen (Belgujo).

Alcidaso, *frato de Dorimeno*. S<sup>ro</sup> Kuchler (Germanujo).

Likasto, *amanto de Dorimeno*. S<sup>ro</sup> Allum (Norvegujo).

8. La Vojo. *Kanto*. S<sup>ino</sup> A. Mudie (Londono).

9. La Kapelo, *deklamata* de S<sup>ro</sup> Otto Simon (Ung Hradisch).

10. Antaŭen. *Kanto*. F<sup>ino</sup> Schafer (Londono).

11. Solo de Fluto. *Humorajo* de S<sup>ro</sup> Dore (Troyes).

12. Ĝis la Revido, *deklamata* de S<sup>ino</sup> Junck (Bordighera).

13. Nova *Kanto*, *deklamata* de F<sup>ino</sup> Warlow (Londono).

14. La Elf-reĝo. *Kanto*. D<sup>ro</sup> Hanauer (Frankfurt).

15. Freneza Ridado. F<sup>ino</sup> Banet (Valenciennes).

16. La Songo de Maliberulo. *Kanto*. Profesoro Offret.

17. Printempo Venas. *Kanto*. F<sup>ino</sup> Farnes (Londono).

<sup>1</sup> Aĉetabla po 1 franko por helpi Blindulojn.

## KONGRES-IMPRESOJ.

H. Bolingbroke Mudie.

La Unua INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO finigis sian tre sukcesegan vivadon en Boulogne-sur-Mer, la 11 de Aŭgusto. Sendube estontaj Kongresoj estos ja multenombraj, sed neniam ni povos forgesi la rimarkindajn impresojn, kiujn faris je ni tiu ĉi unua Kongreso.

Ĉar estas, ni kredas, la intenco de ĉiuj niaj kunbatalantaj Esperantistaj Gazetoj pritrakti detale la Kongresajn agadojn, ni nur verkos kelkajn vortojn pri la ĝenerala impresio.

Estas certe ke tiuj multaj amikoj estis pravaj, kiuj antaŭdiris ke nun Esperanto, por la unua fojo, estos monde reklamata. Ĉar ĉiuj ĵurnaloj, eĉ tiuj kiuj neniam antaŭe volis nomi la "Dua Lingvo por Ĉiuj Nacioj," jes, ĉiuj donis tre favorojn raportojn pri la rimarkinda fervoro, komprenebleco, kaj amikemo, kiuj unuigis la diversnaciajn Kongresanojn.

Kiam ni unue paŝis sur Francan teron, forlasinte la belan turben-ŝipon *Onward*, ni ekvidis ke Boulogne fariga Esperanta urbo. Eĉ la portistoj, kiuj klopodis pri la pakajoj, diris: "A l'Hotel Espérantiste, Monsieur?" Sur la stratoj flugetis verda flago kun blanka kojno, sur kiu estis brodita verda stelo.

Kvankam Boulogne estas sufiĉe granda urbo, du miloj da verdsteluloj estis tre videblaj sur la stratoj, kaj ĉiam, dum eĉ mallonga promenadeto, ni certe renkontus kelkajn afablajn samideanojn.

Persone, mi estis pli ol kontenta, ĉar, dank' al oftaj feliĉaj Esperantaj vojaĝetoj, kiujn kredeble niaj legantoj bone memoros, mi rekonatigis kun tiel granda nombro da Esperantistoj kiel ia alia Kongresano.

La tuta Kongreso estis do serio da kontentigaj renkontoj kun entuziasmaj amikoj. Kaj mi ne povis malpermesi al mi la memoron pri la malgrandaj ĉarmaj kunvenoj kiujn mi ĉeestis dum la du antaŭaj jaroj. Vere, vidante la Boulogne Kongreson, neniu povas plu diri ke Esperanto ne faris mirindegan progreson. Eĉ la Angla *Times* devis konfesi ke la fakto ke tiom da diversnaciaj homoj povis sin tute interkomprenigi nur per Esperanto "ne estis kontraŭdirebla."

The First INTERNATIONAL ESPERANTIST CONGRESS terminated its most successful course in Boulogne-on-Sea on the 11th of August. Future Congresses will, undoubtedly, be many, but never shall we be able to forget the remarkable impressions which this first Congress made upon us.

As it is, we believe, the intention of all our Esperanto contemporaries to treat of the Congressional doings in detail, we will merely write a few words as to the general impression.

Certain it is that those many friends were right who predicted that now Esperanto, for the first time, will be advertised all over the world. For all journals, even those which never previously deigned to name the "Second Language for All Nations," yea, all have given most favourable reports of the remarkable fervour, comprehensibility, and friendliness which united the Congressmen of many nations.

When we first stepped upon French soil, after leaving the fine turbine steamer *Onward*, we saw that Boulogne had become an Esperanto city. Even the porters who looked after the baggage said: "To the Esperantists' hotel, sir!" Over the streets fluttered a green flag with a white corner, on which was embroidered a green star.

Although Boulogne is a fairly large town, two thousand wearers of the green star were most conspicuous in the streets, and invariably, even during a short walk, we were sure to meet some kind friends-in-Esperanto.

Personally, I was more than content, for, thanks to frequent happy Esperantic excursions, which our readers may well remember, I renewed acquaintance with as large a number of Esperantists as did any other member of the Congress.

The whole Conference was thus a series of gratifying *réunions* with enthusiastic friends. And I could not help remembering the small and charming gatherings which I had attended during the two preceding years. Truly, on seeing the Boulogne Congress, none can now truthfully assert that Esperanto has not made the most astonishing progress. Even the English *Times* had to confess that the fact that so many men of divers nationalities could thoroughly understand one another solely by means of Esperanto "was not to be explained away."

“En la mondon venis nova sento,” prave skribis nia eminenta Prezidanto; sed ni multe dubas se eĉ li iam atendis vidi tian pruvon, kia estas donita inter Aŭgusto 4—11. Kaj kion pensis D<sup>ro</sup> Zamenhof pri ĉio ĉi? Ĉu li trovis ke la ekcitiĝo, fervoro, kaj entuziasmo, kiujn li vidis inter la ĉeestantoj; ĉu li trovis ke la tondraj aplaŭdoj, kiuj bonvenigis lin ĉiam kaj ĉie; ĉu li kredis ke tiuj ĉi kaj la aliaj nekalkuleblaj signoj de nia progreso valoris la penadon de la longa veturo de Varsovio ĝis Boulogne?

Oni ja ne povas dubi pri lia respondo!

Kaj tiuj amikoj ankaŭ kiuj venis de eĉ pli malproksime, de Kanado, Nov-Zelando, Japonujo, k.t.p., ĉu ili ne estas ankaŭ kontentegaj?

Kaj, pli ol ĉiuj, ĉu ne estis Maître Michaux, la nelacigebla organizinto, la forta “Blowanto de la Kongresa ventego,” ĉu li ne estas kontentega kaj fierega pro la rezultato de liaj klopodoj? Ja nenie oni estus povinta trovi homon pli taŭga por laborego tia, kaj kiu samtempe posedis tiom da valoraj Gehelpantoj.

“Palmam qui meruit ferat.”

Ni en niaj koroj denove danku kaj gratulu Maître Michaux kaj la Grupon de Boulogne-sur-Mer!

Kompreneble ni Esperantistoj grupiĝis, restis multope ĉe diversaj Esperantemaj hoteloj. Certe hotelestroj ne povas plendi je Esperanto!

Alveninte vendredon nokte, ni jam havis tempon por diversaj ekskursetoj sur la kamparo antaŭ sabatvespero, kiam la Kongreso oficiale komenciĝis.

Doktoro Zamenhof mem alvenis vendredon post glorplena restado en Parizo. Li restis ĉe Maître Michaux. Elektita malmulto estis invitata lin renkonti por privata parolado antaŭ la oficiala vesper-kunveno.

Tiam estis decidite elekti kvin Vic-Prezidantojn de la Kongreso, ĉar D<sup>ro</sup> Zamenhof ne sentis sin sufiĉe forta por preni ĉion sur si. La kvin elektitaj estis:—D<sup>ro</sup> Zamenhof, Prezidanto. Vic-Prezidantoj:—M. Boirac, Rektoro de la Universitato de Dijon; Maître Michaux, Advokato, Boulogne; Doktoro Mybs, Hamburg; Kolonelo Pollen, LL.D., C.I.E., V.D., Prezidanto de la Brita Esperanta Asocio; kaj Generalo Sebert, Membro de la Franca Instituto, Parizo.

La sukceson de la diversaj kunvenoj ni multe ŝuldas al la Urbestro de Boulogne, kiu afablege donis al ni la uzon de la Urba Teatro dum la tuta daŭro de la Kongreso. Vere, sen tiu ĉi helpo, ni ne scias kio estus okazinta,

“Into the world has come a new sentiment,” wrote our eminent President; but we much doubt whether even he ever expected to see such proof as was given between August 4th—11th. And what did Dr. Zamenhof think of all this? Did he find that the excitement, zeal, and enthusiasm which he saw in those present; did he find the thundrous applause which greeted him at all times and places; did he believe that these and the other innumerable signs of our progress were worth the effort of the long journey from Warsaw to Boulogne?

One cannot indeed doubt as to his answer!

And those friends also who came even greater distances, from Canada, New Zealand, Japan, etc., were not they also supremely contented?

And, more than all, was not M. Michaux, the indefatigable organiser, the strong “Blower of the driving wind” of the Congress, was not he most content and proud at the result of his efforts? Assuredly nowhere could one have found a man more competent for such a great work, and who, at the same time, possessed so many valuable helpers.

“Let him who has earned it, bear the palm!”

Let us in our hearts renew our thanks and congratulations to M. Michaux and the Group in Boulogne-on-Sea!

Naturally, we Esperantists gathered together, and stayed in batches at the several Esperanto hotels. Certainly the hotel-keepers cannot complain of Esperanto.

Having arrived on Friday evening, we still had time for sundry little trips into the country before Saturday evening, when the Congress was officially opened.

Dr. Zamenhof himself arrived on Friday, after a glorious stay in Paris. He was staying with M. Michaux. A select few were invited to meet him for a private conference before the official meeting in the evening.

It was then decided to elect five Vice-Presidents for the Congress, as Dr. Zamenhof did not feel sufficiently strong to take all the duties upon himself. The five elected were:—Dr. Zamenhof, President. Vice-Presidents:—M. Boirac, Rector of the University of Dijon; M. Michaux, Advocate, Boulogne; Dr. Mybs, Hamburg; Colonel Pollen, LL.D., C.I.E., V.D., President of the B.E.A.; and General Sebert, Member of the Institute of France.

The success of the various meetings we largely owe to the Mayor of Boulogne, who most generously allowed us the use of the Municipal Theatre throughout the Congress. Indeed, without this help, we know not what would have

ĉar tiu granda teatro mem estis ne tro vasta por la aŭdantaro.

Sabatvespere, ĉirkaŭ 8.20, la amika babilado de la kunvenintoj subite silentiĝis, la teatra kurteneĝo levigis, kaj jen! en longa vico, vidiĝis la eminentaj Francoj, kiuj volis doni al ni la bonvenon sur Franca tero.

Doktoro Zamenhof estis la sola ne-Franco, kaj la aliaj estis la Urbestro, la Sub-Urbestro, la Prezidanto de la Komerca Ĉambro, Generalo Sebert (Membro de la Franca Instituto, Reprezentanto de la Franca Touring Klubo), Profesoro Carlo Bourlet (Prezidanto de la Grupo Pariza), Profesoro Cart, kaj MM. Boulet and Derveaux (la du Sekretarioj de la Boulogne Grupo), kaj laste, sed ne malpleje, Maître Michaux.

Post multaj ĉarmaj paroladoj, Doktoro Zamenhof levigis, kaj tute sensancele aŭdis la plej tondran aplaŭdon imageblan. Multaj malpli fortaj homoj ja estus konfuziĝintaj je tia okazo; sed, kvankam mi sidis en la unua vico de seĝoj, mi ne eĉ vidis tremeti la Doktoran manon. Tute kalme, eble iom aŭtomate, la kreinto de la lingvo Esperanto klarege elparolis belegan paroladon, dum li rigardis antaŭ siaj piedoj la triumfon de lia laboro, la floron de la proesperanta batalantaro.

Kaj, dum la silentego kiu regis dum la longa parolado, ne eĉ unu vorto el liaj lipoj perdiĝis. Estis same ĉiaokaze dum la tuta Kongreso. Ĉiu Esperantisto sen malhelpo komprenis ĉiun Esperantiston!

Detalan priskribon de la parolado de Doktoro Zamenhof ni lasas al tiuj el niaj samtempaj jurnalaj, kiuj estas difinitaj por oficiala raportado.

Kiam D<sup>o</sup> Zamenhof sidiĝis, kaj la aplaŭdoj reaŭdiĝis, la kurtene falis, kaj la Kongreso oficiale malfermiĝis.

Iom poste la Boulogne Grupo donis tre ŝatindan koncerton. La virina horo, sub la direktado de la sindona S<sup>no</sup> Bergier, estis speciale aprobinda.

Nia kunverkinto, S<sup>o</sup> Paul Boulet, deklamis "La Bano de la Pastro" kaj ankaŭ havis rolojn en la du komedioj kiuj ludiĝis dum la Kongreso.

Ni ja volus ke ĉiuj Esperantistaj Grupoj estu tiel telentplenaj, kiel tiu en Boulogne-sur-Mer!

Post la koncerto, ni nature rekonveniĝis en la Grand Café, ĉar ni estis en Francujo, kie la kafejo estas la ĝenerala kunvenejo. En la sama eleganta konstruaĵo ses-aŭ-sepdek Esperantistoj babiladis kun D<sup>o</sup> Zamenhof, je neoficiala kunveno la antaŭan nokton, tial ni do bone konis la lokon.

La proksiman tagon estis, kompreneble, Dimanĉo. Certe neniu el la Anglaj partoprenantoj iam ĝuis tian Dimanĉon antaŭe; kaj, por kvietigi mal-

happened, for that fine theatre itself was none too vast for the audience.

On Saturday evening, about 8.20, the friendly babbling of those assembled was suddenly hushed, the drop-curtain was raised, and lo! in one long row were seen the eminent Frenchmen who desired to welcome us to French soil.

Dr. Zamenhof was the only non-Frenchman, and the others were the Mayor, Deputy-Mayor, President of the Chamber of Commerce, General Sebert (Member of the Institute, Representative of the Touring Club de France), Professor Carlo Bourlet (President of the Paris Group), Professor Cart, and MM. Boulet and Derveaux (the two Secretaries of the Boulogne Group), and last, but not least, M. Michaux.

After many charming speeches, Dr. Zamenhof rose, and quite calmly heard the most thundrous applause imaginable. Many weaker men would have been confused under such circumstances; but, although I sat in the front row, I did not even see the Doctor's hand shake. Most calmly, maybe somewhat automatically, the creator of the language Esperanto very clearly delivered a most beautiful speech, while he saw before his feet the triumph of his labours, the flower of the Esperantist army.

And, during the great silence which reigned during the long speech, not even one word from his lips was lost. It was ever thus throughout the Congress. Every Esperantist without difficulty understood every Esperantist.

A detailed description of Dr. Zamenhof's speech we leave to those of our contemporaries who have been selected for reporting officially.

When Dr. Zamenhof was seated, and the applause had broken forth again, the curtain fell, and the Congress was officially opened.

Shortly afterwards the Boulogne Group gave a most enjoyable concert. The ladies' choir, under the direction of the devoted Mme. Bergier, was specially worthy of applause.

Our collaborator, M. Paul Boulet, recited "The Pastor's Bath," and also acted in the two comedies performed during the Congress.

Would that all Esperantist Groups were as endowed with talent as that in Boulogne-on-Sea!

After the concert we naturally re-assembled in the Grand Café, for we were in France, where the café is the general meeting place. In the same elegant building sixty or seventy Esperantists had chatted with Dr. Zamenhof, in a non-official gathering the night before, so we knew the place well.

The next day was, of course, Sunday. Assuredly none of the English members had ever enjoyed

trankvilajn konsciencojn, ni certigis al ili ke, ĉar estis la dua tago (de la Kongreso) ne estis eble ke ĝi estu ankaŭ Dimanĉo, kiu estas la unua tago!

Matenfrue ni kunvenis, laŭ nacioj, por aranĝi la elekton de reprezentantoj pri la Lingvaj Aferoj, k. t. p.

Post la kunveno, la elektituloj rekunvenis sole, kaj la ceteroj frue matenmanĝis por povi aliri la Ĉevalkuradojn, en speciala vagonaro. La tago estis ĉarmega, aero klara kaj freŝa, suno varma, ĉielo blua. Kiam do S<sup>ro</sup> Gehet, Sekretario en Rouen, proponis al mi ke ni iru ĝis la ĉevalkuradoj per vel-boato, anstataŭ vagonare, la propono estis tiel alloga ke mi forlasis mian patrinon kaj la multajn amikojn, kaj vojaĝis kun nur tri.

La maro estis tiel bela, tamen iom maltrankvila, ke, alveninte ĝis Wimereux (kie estas la ĉevalkurejo) blovita de favora vento, S<sup>ro</sup> Gehet kaj mi decidis returnen-iri ĝis Boulogne, kaj poste veturi trame. Tiel okazis ke ni nur vidis la lastan kurson—de la Oficiroj—kaj revenis urbon per la Esperantistplena vagonaro.

Post rapida vespemango, ni devis forkuri ĝis la teatro, kie okazis la "Internacia Koncerto." Eĉ pli plenigita ol antaŭe, la teatro ja prezentis kuragigantan aperon. Diversaj kantoj, deklamoj, kaj muziko plenege sukcesis, kaj la *Edziĝo Kontraŭvola*, de Molière, ludigis de oknaciaj aktoroj. Neniam antaŭe, certe, okazis tia ludo. Inter la aktoroj kaj la aŭdantoj estis unu sola interkomprenilo—Esperanto; kaj estis ja rimarkinda afero ke, preskaŭ sen antaŭludoj, komedio sukcesis tiamaniere!

Doktoro Zamenhof kaj lia afabla edzino invitis nin, la naŭ aktorojn, en sian kupeon, kaj dankis nin. Dum la longa traŭro de la teatro kiun postulis tiun viziton, ni ja estis subpremegataj je gratuloj. La vestoj, scenoj, kaj ĉio estis ja bone aranĝitaj.

La dua parto konsistis el kantoj, deklamoj, ŝercoj, k. t. p., kiuj ja elmontris veran talenton. Ni presigas la programon, kaj ĉiama estu la honto de tiuj Esperantistoj kiuj povis, sed ne klopodis ĉeesti!

Post koncerto, kafejo; post kafejo, lito; post lito, dormo; post dormo, festenoj (bis). Tiel oni povas priskribi la unuajn Kongresajn tagojn multvorte.

Lundo, Aŭgusto 7, Banklibertago en Anglujo kaj Skotlando, Esperantalibertago en la Esperantujo! Ĉu oni iam povos tiun tagon forgesi?

Matenmanĝante, ni memoris la konsilon de

such a Sunday before; and, to set disturbed consciences at rest, we assured them that, as it was the second day, it could not be Sunday also, which is the first day!

Early in the morning we met, according to nationality, to settle the election of representatives for Linguistic Matters, etc.

After the meeting, those elected met together alone, and the rest lunched early, in order to go to the Races by a special train. The day was most delightful, air clear and fresh, sun warm, sky blue. When therefore M. Gehet, Secretary of the Rouen Group, suggested that we should go to the racecourse by sailing-boat, instead of the train, the proposal was so attractive that I deserted my mother and the many friends, and journeyed with but three.

The sea was so beautiful, yet a little rough, that, having arrived in Wimereux (where the racecourse is situated), M. Gehet and I decided to return to Boulogne, and later go by tram. Thus it happened that we saw only the last race—the Officers'—and returned to town in the Esperantists' train.

After a hasty dinner, we had to tear off to the theatre, where the "International Concert" was to take place. Even more crowded than the day before, the theatre did indeed present a most encouraging appearance. Various songs, recitations, and music were entirely successful, and the *Marriage Forcé*, of Molière, was performed by actors of eight nationalities. Never before has such a play taken place. Among the actors and audience there was but one solitary link—Esperanto; and it was indeed most remarkable that, almost without rehearsal, the comedy succeeded in such a manner!

Dr. Zamenhof and his amiable wife invited us, the nine actors, to his box, and thanked us. During the long tour of the theatre which this visit necessitated we were indeed overwhelmed with congratulations. The clothes, scenery, and everything were most excellently arranged.

The second part consisted of songs, recitations, humorous pieces, etc., which exhibited genuine talent. We print the programme, and everlasting be the shame of those Esperantists who could have been, but who did not take the trouble to be, present.

After concert, café; after café, bed; after bed, sleep; after sleep, jollifications (bis). Thus might one describe, in a few words, the first days of the Congress.

Monday, August 7th, Bank Holiday in England and Scotland, Esperanto Holiday in Esperantoland! Can we ever forget that day?

While breakfasting, we recollected the

Ham Mukasa, kaj ne tro manĝis, pro la venontaj bonaj manĝaĵoj; ĉar ĉu hodiaŭ ne estas la tago difinita por la Granda Internacia Festeno, kaj ĉu oni ne estis dirinta al ni ke eble la ĉambrego de la Kazeno ne estos sufiĉe granda por ni?

Jes, estis tiel! Kvankam ĝi povis enhavi 400 manĝantojn, kvindek da Esperantistoj devis iri en apudan ĉambron. Bonega sukceso!

Kaj ĉie la vorto Esperanto. Esperanta Visko, Esperanta Ĉampanvino, Esperanta ĉi-tio kaj Esperanto tio. Kaj ĉie Esperantistoj. Ne grave ĉu Ruso, Polo, Franco, Germano, Belgo, aŭ Anglo, ĉiuj estis kaj ĉiam estos, Esperantistoj.

Ĉu iam oni aŭdis tiajn paroladojn? Unue D<sup>ro</sup> Zamenhof, poste eminentaj Francoj kaj reprezentantoj de ĉiuj ĉeestantaj nacioj, esprimis, per belsona Esperanta, siajn pensojn kaj esperojn. La tempo rapide forflugis!

La fotografantoj havis multe da okupado tiun tagon; ĉar, kvankam ili bone laboris dum la festeno mem, eĉ pli bone estis kiam, forpelitaj en la Kazen-gardenojn, ni ĉiuj amasiĝis apud muzikludejo, por fotografiĝi, kaj aŭskulti tiujn naciojn, kiuj ne ankoraŭ havis sian okazon en la salonego.

Oni ja povas esti tre elokventa per Esperanto. La efekte de la paroladoj estis tre favorega. Ĉiuj estis tute interesaj, tute bone elparolataj. Mi ne volas aplaŭdi ian specialan paroladon super alia, sed neniam estis pli elokventa ol tiu elparolita de nia plej juna amiko, Edmond Privat, el Genevo. Inter la plej bonaj parolintoj estis D<sup>ro</sup> Zamenhof (Polujo), MM. Michaux, Boirac, Bourlet, Cart, Javal, S<sup>rino</sup> Bergier (Francujo), MM. Grabowski (Polujo), Ostrowski (Rusujo), Balik (Bohemio), Simon (Aŭstrujo), Borel (Germanujo), S<sup>rino</sup> Junck (Italujo), MM. Codorniu (Hispanujo), Krikorts (Svedujo), St. Martin (Kanado), Seynaeve (Belgujo), Privat (Svisujo), Schneeberger (Protestantismo), Abbé Peltier (Katolikismo).

Kvankam la festeno komenciĝis tagmeze, estis jam la kvina antaŭ ni povis fortiri nin, por pretigi nin por la kruela vaporsipo, kiu devis korpe disigi nin de la Esperantistoj.

Sed anime, ili restas ankoraŭ kun ni. Kiam, traŭrante la argentan strekon je la horo de la sunkuŝiĝo, ni ekvidis tute rimarkindan oran landon okcidenten, ni figuris al ni ke ni veturas al tiu glora ora lando de la Esperantismo, kie regas frata amo kaj kontentiĝo, la ora lando kiu devas iam veni, la lando de la interkompreniĝo de la tuta homaro.

Amikoj de la Kongreso, *Ĝis la revido!*

N.B.—Priskribo de la lastaj tagoj de la Kongreso aperos en No. 24.

counsel of Ham Mukasa, and did not eat too much, on account of the good things to come; for was not to-day the day allotted for the great International Banquet, and have we not been informed that possibly even the great hall of the Casino will not be sufficiently large for us?

Yes, so it was! Although it could contain 400 diners, about fifty Esperantists had to dine in a room adjoining. A magnificent success!

And over all the name Esperanto. Esperanto Whiskey, Esperanto Champagne, Esperanto this, and Esperanto that. And everywhere Esperantists. No matter whether Russian, Pole, Frenchman, German, Belgian, or Englishman, all were, and ever must remain, Esperantists.

Have such speeches ever been heard? In the first place, Dr. Zamenhof, then eminent Frenchmen and representatives of all nations present, expressed, in sonorous Esperanto, their thoughts and hopes. Time sped rapidly!

The photographers had plenty to do that day: for, although they worked hard during the banquet itself, it was even better when, expelled into the Casino Gardens, we all gathered hard by a bandstand to be photographed, and to hearken to those nations who had not yet had their opportunity in the hall.

One can, indeed, be most eloquent in Esperanto. The effect of the speeches was most favourable. All were thoroughly interesting, all well-delivered. I do not wish to praise any special speech above another, but none was more eloquent than that of our youngest friend, Edmond Privat, of Geneva. Among the best speakers were Dr. Zamenhof (Poland), MM. Michaux, Boirac, Bourlet, Cart, Javal, Mme. Bergier (France), MM. Grabowski (Poland), Ostrowski (Russia), Balik (Bohemia), Simon (Austria), Borel (Germany), Mme. Junck (Italy), MM. Codorniu (Spain), Krikorts (Sweden), St. Martin (Canada), Seynaeve (Belgium), Privat (Switzerland), Schneeberger (Protestantism), Abbé Peltier (Catholicism).

Although the feast began at mid-day, it was five o'clock before we could tear ourselves away to prepare for the cruel steamer which had to separate us, in body, from the Esperantists.

But in mind they remained with us still. When, crossing the silver streak at the sunset hour, we caught sight of a wonderful golden shore in the west, we pictured to ourselves that we journeyed to that golden land of Esperantism, where reign brotherly love and contentment, the golden land which must come some day, the land of the mutual intercomprehension of the human race.

Friends of the Congress, *Ĝis la revido!*

## ORIENTAJ MEMORAĴOJ.

Originale verkita de Kolonelo H. K. Gordon.

Estas bonegaj malsanulejoj, provizataj por ĉiuj, senpage.

La malliberejoj estas tiel komfortaj, ke la malriĉaj estas pli bone servataj kaj nutrataj ol hejme.

Pruntedono de mono per Hindaj bankistoj, nomitaj "Chetties," estas grava profesio, sub protekto de Britaj juĝejoj: jarprocento estas preskaŭ neniam malpli ol dekdu, kaj kontraŭ bona garantiaĵo: la "Chetties" portas malmulte da vestaĵoj, eĉ la plej gravaj estroj.

Estas tre bonaj ĉevaletoj, Angle "ponies," alkondukataj de malproksimaj montaj kamparoj. Ili bone faras kurson, kaj unuj povas salti, portante plenkreskan viron, pli ol sia propra alteco. Ĉe la kursoj, la saltbaroj estas ofte konstruitaj de ananasoj, anstataŭ kotatero, por ŝparemeco.

Tutmondo scias ke la floroj, nomitaj "orkido" sin produktas en Birmanujo.

Forirante de "Rangoon," oni vojaĝas suden al insulo de "Penang," kaj plie ne malproksime al "Singapore."

"Singapore" estas grandega kaj gravega haveno; ĉiuj ŝipoj irante de okcidento al oriento kaj kontraŭe tie enhaveniras. Enŝipigejoj kaj tenejoj okupas kvar aŭ kvin mejlojn da marbordo. Hoteloj estis indiferentaj: sed la Klubo estas tre komforta.

Kuŝante apud la Ekvatoro, la klimato estas unuforme varmega kaj malseka dum tuta jaro: pluvo falas preskaŭ ĉiutage. Estas multe da Ĥinoj, kaj Ĥinoj (Koringi). La komuna lingvo, inter multaj, estas "Malay," kiu, kiel Hindustani en Hindujo, reprezentas tie nian Esperanton.

La maro estas punktata de insuloj.

En "Java" kaj "Kambodja" sin trovas misteraj restaĵoj de antaŭa okupo de forgesita Hinda popolo: la vastaj ruinoj de "Borubuda" kaj "Angkor" pruvas gravan antaŭan civilizacion.

Vojirante sur Franca poŝtŝipo (sur kiu oni sin trovas tre komforta, kaj bone servata), oni atingas la proksiman Francan havenon de "Saigon." La urbo kuŝas kvardek mejlojn de la enfluo de la granda rivero, la "Mekong," de kiu la veturado ŝajnas facila, kontraŭ tiu de la "Ganges" al "Calcutta." Multe da mejloj ĉirkaŭe streĉas plataj unuformaj rizkamparoj, famaj pro grandega raso de kuloj.

Respublika patramo penas forgesigi al gajaj Francoj ke "Saigon" ne estas Parizo, kaj ke la Teatro de Saigon ne estas la Porte St. Martin.

Ĉe fino de Oktobro, la klimato de "Hongkong" estas efektive malproksime de esti agrabla:

estante varmega kaj malseka: tamen, en Decembro, estas vere agrabla. Dum la daŭro de la vojaĝo oni pasas multe da insuloj. Estas ĉie multe da Ĥinoj. Vasta estas la haveno, kaj plena da ŝipoj de ĉiuj nacioj.

La monto, nomita "Peak," kiu sin levas poste de la urbo kaj meze de la insulo estas la sanigejo por Eŭropoj, kaj estas atingebla per ŝnurega relo, tre kruta. De la pinto, ĝuas oni belan vidon malsupren tra la haveno ĝis la Ĥinlando. Domoj, stratoj, k.c., estas bone konstruitaj. La tombejo "Happy Valley" kuŝas bele en arba valo.

Oni oferas kuriozaĵojn de Japanujo kaj Ĥinujo; sed oni devas esti singardema pri aĉetaĵoj sen konsilo.

De "Hongkong" oni vojaĝas al "Canton," la granda ĉefurbo de sud Ĥinujo: enŝipiginte sur rivera vaporŝipo, Amerike konstruita, de la enhancebleco po kvar miloj da vojaĝantoj, kaj da du miloj da "tons" de ŝarĝo, ni atingas "Canton" post dudekkvarhora vojiro.

La riverborda vidiĝo nin frapas per surprizo: ĉiam vasta popolaro loĝas sur boatoj, kunligitaj kaj alligitaj al bordo ŝnure. Por vendi, oni alportas per boatoj vivantajn fiŝojn, precipe grasigitajn karpojn, en traboritaj putoj tra kiuj fluas la riverakvo.

Estas necesege dungi gvidiston: certe, neniu volonte irus sole tra la mallargaj stratoj kaj aleoj, kie pasas kaj repasas tiom da malamikaj Ĥinoj kun minacaj vizaĝoj, kiuj foje insultas "alilandajn diablojn" per ofendaj ekkrioj.

La gvidisto provizas seĝojn kaj portantojn, por ĉiu persono: ne estas dandĝere marŝi. La stratoj estas mallumigitaj per multe da elpendaĵoj de butikoj: homoj baldaŭ amasiĝas, kaj la gvidisto zorge vin forrapidigas. Sin trovas temploj (pagoda) Ĥinaj, ankaŭ la Katolika katedralo. De tie al la ekzekuta loko; kie krimuloj estas turmentegataj kaj senkapigataj; tiamamiere ordinare estas tio ke neniu turnas sian kapon por rigardi.

Eble inter tia vasta loĝantaro, treega severeco estas tute necesa. Gepatroj kaj prapatroj estas rigardataj kun treega respekto: sekve, patromortiginto ricevas la morton per mil tranĉoj: escepte se, bonŝance, la cinabra kraĵono de la Imperiestro eĉ "Peking" elviŝas lian malfeliĉan nomon.

Senbedaŭro ni turnas dorsojn kontraŭ la malaperanta vidiĝo, kaj post nelonge revenas eĉ Hongkong. Tie ĉi, la Hotelo estas rezone komforta; multe pli ol tiu en Hindujo, sed malpli ol tiuj en Japanujo.

## SAVITA DE MORTO.

Originale verkita de Generalo George Cox.

## ĈAPITRO IV.

Priskribi ĉion, kion mi sentas, estas tute neeble. Mi altlevas la paperon, malfermas la fenestron, kaj permesas al la malvarmeta noktaero malhejti mian brulantan frunton. Mi sentas kvazaŭ mi freneziga, kaj, kiam la papero, kiun mi tenas en mano, forflugetas tra la malfermita fenestro en la mallumecon, mi estas tute nekonscia ke mi perdas ion gravan.

Post intertempo, mi plitrankviliĝas, kaj ekkonsideras kiamaniere okazis la malfeliĉaĵo. Mi rememoras, ke la armilfaristo montris al mi, ke oni povus ĉani la pistolon kiel ordinaran paŭilon, kaj tiam, se la tirilo estos ŝovita antaŭen, ĝi fariĝos hartirilo, kaj la plej malpeza tirilpremo faligos la ĉanon. Evidente la maljunulo estis ĉaninta la pistolon, kaj nekonscie ŝovinta antaŭen la tirilon. Ho! kia malsagulo mi estis, ke mi ne klarigis al li la tutan meĥanisman de la pistolo amtaŭ permesi al li ĝin tuŝi? Sed, kiel mi povis scii ke li ĝin ŝargus? Ne, certe mi ne estis mallaudinda malgraŭ ĉio. Sed, kial mi ĝin ne forprenis de li, kiam li ekparolis pri sia timiga projekto? La penso pri "projektoj" konfuzas al mi la cerbon, kaj mi komencas pripensi la teruregon de mia situacio! "Ho! Dio!" mi ekkrias, "lia tuta projekto estas okazinta!" Kaj, tiam liaj vortaj fatalaj trakuregas tra mia cerbo! . . . "Kiel vi povis prui ke vi ne estis mortiginta min?" Kiel mi povis? Jes, mi povas! La papero! . . . Kaj, tiam, kiel fulmo, jen ekbrilas en mian spiriton, ke la papero, pruvanta mian senkulpecon, estas perdita! perdita! perdita for de ĉia espero iam ĝin revidi! "Ĉu vi ne vidas ke vi estas mortonto, se mi ne atestos ke mi pafis min mem hazardi?" Grandĉielo! mi ja estas! Nenio por prui mian senkulpecon! Mia cerbo brulegas! Mi ekkuregas al fenestro! Ĉio estas malluma kiel peŝo, krom la rapidflugantaj lumradioj eljetataj de la vagonfenestroj sur la plektbarilojn, kiuj, kontraste, aperigas pli malluma la kamparon transe. Mi penas malfermi la pordon. Ĝi estas ŝlosita! Mi kuregas al la alia! turnas la tenilon, kaj ĝi cedas! Pli kaj pli brulegas mia cerbo! Mi ekkaptas la mortkorpon! tiras ĝin per la ŝultroj, kaj trapuŝegas ĝin tra la pordo, ĝis ĝi malaperas en la mallumecon! Mi ĵetas el la fenestro ĉion ne apartenantan al mi mem, kaj rapide enpuŝas en mian poŝon la aĵetojn, kiujn mi estis metinta sur la sidejon, kiam mi penadas trovi la ŝlosilon de la pistolujo. Mia okulo ekvidas

la fatalan turnpafilon! Mi altlevas ĝin! Ĉu mi plenigos la tragedion? Unu malgranda premeto, kaj mi vivos ne plu! Ne! tio min stampus veran mortiginton! Kio ajn okazos, mia okuloj neniam restos sur tiun mortigantan armilon! Mi enmetas ĝin en la ingon, kaj ĝin ĵetas el la fenestro!

Kaj nun la rapideco ekmalakceliĝas. La lumiloj de stacidomo videbliĝas! Ni haltas! Terura sento de timo, ke iu eniros la vagonon, kaj vidos la sangmakulojn sur la planko kaj kusenoj, min ekkaptas! La agonio de necerteco estas preskaŭ netolerebla, kaj la duonminuta halto ŝajnas al mi horoj! Fine, la fajfo de la konduktoro! kaj ni foriras!

Kaj nun mi komencas pli trankvile pripensi pri mia situacio, kaj konsideri kian fatalan eraron mi estas farinta, ĵetinte la mortulon el la vagono. Kiel mi povis esti kulpigita je mortigo? Kian kaŭzan mi povis havi por mortigi la malfeliĉulon? Certe ne pro rabado, ĉar la trovado de lia mono pravas tion. Lia "projekto" estis simple ridinda. Ho! kia idioto mi estis, ke mi ne lasis la mortkorpon tie, kie ĝi kuŝis kaj diris la tutan veron ĉe la stacidomo, kie ni ĵus haltis? Tro malfrue! tro malfrue! Nun mi devas konfidi je sorto! Sed, ho! ĉielo! nomigi mortiginto! Tirigi en juĝejon! Aŭskulti la malvarman, senkompatan voĉon de ia malbenata advokato alparolanta la juĝantaron, rakontanta fakton post fakto pruvanta mian kulpecon! Ĉio vera! kaj mi . . . senkulpulo! "Dio mia, estas frenezige!" mi ekkrias, kovrante mian vizaĝon per la manoj, kaj ekplore-gante je malespero!

Kio okazis kelktempe, mi ne scias. Mi devas esti enfalinta en letargiecon, ĉar mi subite konsciiĝas, ke mi aŭdas voĉon kriegantan "Preston Park! Preston Park!"

Mi eksaltas de la sidejo, kaj malfermas la fenestron.

"Ĉu vi deziras deiri, sinjoro?" diras voĉo.

"Jes," mi respondis.

"Nu! rapidu, mi petas, ĉar ni ne haltas minuton."

Kunprenante mian vojaĝkovrilon kaj palton, mi eliras el la vagono. La fajfo sonas, kaj la vagonaro foriras.

Mi marŝas al la stacipordo; oni demandas mian bileton; mi ĝin donas al la portisto, kiu rigardinte ĝin, diras:—

"Kompreneble vi scias ke tiu ĉi stacidomo ne estas Brighton?"

"Jes," mi respondas, paŝante sur la vojon.



Pluvas forte, kaj mi memoras ke mi lasis mian ombrelon en la vagono.

Senzorge pri la pluvo, mi ŝanceliras laŭ la vojo al Brighton.

Mi memoras nenion plu, ĝis kiam mi atingas la domon de mia patrino, kaj la servistino malfermas la pordon.

“Vi tre malfruas, sinjoro,” ŝi diras; “la mastrino kaj la junaj sinjorinoj kuŝiĝis. Sed ho! kiel vi estas malseka kaj pala! Ĉu io okazis, sinjoro?”

“Ne,” mi respondas, prenante la kandelington. Mi rapidas supren al mia ĉambro, kaj jetas min sur la liton.

### ĈAPITRO V.

“Ĉu vi estas malsana, Franĉjo, mia kara?” diras dolĉa, aminda voĉo.

Estas la voĉo de mia patrino. Mi turnas min en la lito, kaj lace malfermas la okulojn.

“Mi ne sentas min tre bonsane. Mi opinias ke mi malvarmumis hieraŭ nokte, marŝante domen tra la pluvo.”

“Kial vi estis tiel malfrue, mia kara? Mario

al mi diris, ke vi ne revenis ĝis la deknua kaj duono, kaj ke vi ŝajnis tre nekvieta kaj malsaneta.”

Ĉiuj la teruraj okazaĵoj de la antaŭa nokto kuregas tra mia cerbo. Ĉu mi diros al mia bona, aminda patrino la tutan historion? Ha! ne! tiu timinda tragedio devas eterne ŝlosiĝi en mia brusto.

“Mi eliris ĉe Preston Park, patrino mia, pensante ke mi ĝuos la marŝadon; sed malfeliĉe mi lasis mian ombrelon en la vagonaro, kaj pluvegis senĉese la tutvojon.”

“Mi esperas, kara,” respondas mia patrino, “ke estas nur malvarmumo, kiun vi ekkaptis. Pli bone estas resti en lito. Mi suprensendas al vi tason da teo, kaj tiam eble bona refreŝiga dormado resanigos vin, ĉar vi ŝajnas febra kaj via pulso batas iom rapide.”

Mia bona patrino min kisas, kaj forlasas la ĉambron. Baldaŭ aperas la manĝaĵo, kiun, malpeza kiel ĝi estas, mi malfacile englutas. Tamen ĝi refreŝigas min, kaj baldaŭ mi ekdormegas.

(*Daŭrigota*).

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

Mi forgesas ĉu estis en Svisujo aŭ Aŭstrujo ke, en publika lavejo, mi vidis muelilon por sapo. Oni metis sub ĝi la maldekstran manon, turnis du aŭ tri fojojn per la dekstra mano la turnilon kaj ricevis en la elŝtreĉitan manon maldekstran, sufiĉon da saporotaĵoj por lavi per ili la manojn. Tiuj kiuj kutimas vidi en Anglaj lavejoj stacidomaj la saptableton jam de multaj manoj uzitan, certe tre ŝatus tian muelilon. Mi mem kutime kunportas saporotetojn, sed foje mi forgesas ilin kunpreni, kaj tiam—nu, mi sopiras je la muelilo kiu muelas sapon.

Pro kio mi komencas Amerikan memoraĵon per priskribo de ilo kiun mi vidis en Eŭropo? Pro tio, ke por vojaĝanto negrandaj aferoj estas ofte la plej gravaj; ankaŭ ke mia cerbo insistas kunmeti tiun ĉi memoraĵon—eble pro la turnilo—kune kun tiu de la salskuilo Amerika (*American salt shaker*) tiamaniere ke se mi pensas pri la unu mi ĉiam pensas ankaŭ pri la alia.

“Sed kio,” oni demandas, “estas la salskuilo.” Ĝi estas, por tiel diri, larĝigita piprujo en kies kovrilo la truoj estas tamen pli grandaj ol tiuj kiujn kutime havas piprujo. Plie oni fabrikas ĝin ne el vitro sed el porcelano kaj presigas sur ĝin belan floran aŭ alian desegnon.

Trapasantan la kovrilon (almenaŭ en la plej

bonaj specoj) oni trovas ilon por grati kaj disigi la salerojn. Kiel bone scias ĉiu mastrumistino saleroj dum malseka vetero kune alĝuigas. Por spici ovojn poĉumitajn, k.t.p., la salskuilo estas ilo tre konvena. Kelkajn mi aĉetis kaj kunportis hejmen.

Ofte kuniĝoj de pensoj estas tre kuriozaj. Ekzemple, mi pense kunigas veturon kiun junule mi faris per *kajiko* de *Constantinople* kun sperto kiu al mi okazis en malgranda Amerika vilago. Jen ili:—De *Constantinople* kun kelkaj kunuloj mi per *kajiko* supreniris la Kornon Oran (The Golden Horn) ĝis la Dolĉaj Akvoj de Eŭropo (The Sweet Waters of Europe). Kiam ni tien alvenis ni estis ĉiuj malsataj, sed ni trovis por manĝi nur nigran panon kun kelkaj malgrandaj fiŝoj (mi pensas sardeloj), kaj por tranĉi tiujn apetitdonajn manĝaĵojn ni posedis la ne tro puran poŝtranĉilon de nia gvidisto, kiu ilo eble ĵus antaŭe tranĉis tabakon. Unu buŝpleno mi englutis kaj tuj sentis en mi grandan bezonon serĉi tiun ĉambron kiun provizis por tielaj okazoj la antikvaj Romanoj.

La Amerika sperto estas la jena:—Mi alvenis malgrandan vilagon, kie, ĉar tie mi ne intencis resti longtempe, mi eniris loĝantejon.

Mi tuj trovis ke mi estas malantaŭenirinta al la kutimoj de niaj mezepokaj antaŭuloj, ĉar, ĉe la

mangoj oni ĉirkaŭportis sur plado la viandon, el kiu la gastoj fortranĉis siajn porciojn ĉiu per sia propra tranĉilo.

Mi diris al Amerikano ke tiu ŝajnas al mi tro malagraba kutimo. "Ho, ne," li respondis, "ĉiu tuŝas nur tion kion li mem mangos. Pro tio la kutimo ne estas malagraba. Sed vi Angloj estas ĉiuj tre malsatemaj!"

Tamen mi estis danka ke oni permesis al mi fortranĉi la unuan porcion; sed kredeble se mi estus restinta en tiu vilaĝo mi baldaŭ kutimiĝis al la manĝmaniero kaj ĝin ne plu estus rimarkinta.

En verko, mi pensas de *Maz O'Rell*, oni legas ridigan rakonton pri Amerika riĉegulo kiu per siaj propraj manoj purigis la botojn de sia Angla amiko; kaj vere la malfacilaĵo kiun prezentas al Amerikano la purigado de siaj botoj estas por ni preskaŭ malkomprenebla.

Mi apenaŭ estis enirinta Amerikan hotelon kiam mi legis la anoncon: "La Hotelestro ne respondas pri botoj lasitaj ekster la pordoj de la dormoĉambroj."

Kredeble la onklino ĝin ne legis, ĉar, je tre frua horo matene, mi aŭdis longedaŭran frapegadon sur la pordon de mia dormoĉambro, kaj malferminte ĝin mi vidis homon kiu tenas en la mano paron de botoj de Sinjorino, kaj demandas tujan pagon por la purigo de ili.

"Ĉu oni ne devas enskribi la purigprezon sur la kalkulon?"

"Ne, la afero estas tute persona; li jam malŝparis sufiĉon da tempo; ĉu oni atendas ke li serĉu la tutan hotelon por ricevi la purigpagon de paro de botoj? Mi devas tuj pagi aŭ li forportos la botojn, k.t.p., k.t.p."

Certe li estis en tre malbona humoro, sed li ĵus estis vekinta min, kaj kiam oni tion faras per frapado sur pordon, sendube li suferos je doloro de la artikoloj. Plie la onklino diras al mi ke nur kiel grandega favoro li konsentis serĉi mian ĉambron. Li subite estis prezentinta sin al ŝi per la sama demando; tujan pagon aŭ li detenos la botojn; kaj, ho, ve, la onklino ne havis en sia monujo Amerikajn monerojn. Ŝi petis pri la tuja aĉeto de kesteto de purigiloj. Amerikano kutime kunportas tian kesteton kaj purigas mem siajn botojn.

Ĉe la subetaĝo de hotelo oni trovas botpurigiston, kaj oni pagos al li sufiĉan prezon por liaj servadoj. En la stratoj knaboj faros la purigon je malkara prezo, sed ili havas ŝajnon timi la policianojn. Eble estas malpermesite al ili eniri la stratojn kie ili faras la plej grandan gajnon.

Foje mi legis pri homo kiu faris vojaĝon en kesto. Se mi legus ke tuta familio faris vojaĝon en kesto *Amerika* mi neniel estus surprizata, tiel

ĝi estas grandega. Fanfaronante pri la fruktoporteco de la sojlo de kelka regiono, Amerikano diris ke iu metis sur ĝin komodon, kaj jen, ĉe la mateno la komodo estis enradikinta kaj kreskinta, kaj li trovis ne komodon sed dometon de kvar ĉambroj. Nu, se oni metus sur *tian* sojlon keston Amerikan kredeble li trovos ĉe la mateno veran ŝipegon de *Noah*. Amerikanoj ja uzas ne kestojn sed kesteĝojn, kaj jen estas, laŭ mia opinio, la kaŭzo de tiu "eg"eco.

Paginte oni lernas! Kiam ni alvenis Amerikon ni havis tutan aron de malgrandaj pakajoj, kaj kiam ni forlasis *New York* mi kalkulis ke mi jam pagis dudek dolarojn (= kvar librojn = cent frankojn) por la movigo de ili. La kosto estas tute sama por malgranda aŭ grandega kesto, kaj por la alportado, kaj ĉe la pakajtenejo.

Mi, tial, tuj konvertiĝis al la Amerika metodo; aĉetis la plej grandan keston kiun mi trovis, kaj en ĝin enmetis, mi pensas, dekkvar el miaj pakajetoj.

Vojaĝante kun sinjorino mi ne povis imiti la Amerikanon kiu al mia demando kiajn preparaĵojn li farus por ĉirkaŭvojaĝi la mondon respondis, "Nu, fremdulo, mi divenas ke mi nur metus en mian poŝon kombilon kaj dentpurigilon."

Oni povas bone supozi ke kesteĝojn tiajn kiajn mi priskribas, Amerikaj servistoj neniel deziras suprenporti en la dormoĉambrojn.

Tre ofte la vojaĝanto lasas ilin ĉe la stacidoma pakajtenejo, kie foje mi vidis aron de Amerikanoj, ĉiu kun sia *gripsack* (malgranda valizo kiun oni portas per la mano), elprenantaj el la kesteĝo tion kion ili bezonas por la venonta tago, kaj enmetantaj tion kion ili alportis en la *gripsacks*. En hotel-vestibuloj (t.e., en la vestibuloj de *kelkaj* hoteloj) oni vidas la saman ŝanĝadon de tolaĵo.

Inter miaj pakajoj estis fortega leda kesto kiu tre incitis la malamon de la Amerika portistaro. Jen kion diras al mi la onklino:—"Ĉe unu stacidomo ŝi vidis portiston kiu trenis laŭlonge la trotuaro tiun keston supro malsupren renversitan."

Amerikano kiu trapasas diris al li:—"Ĉu vi ne vidas ke vi trenas tiun keston supro malsupren. Tiamaniere trenante vi certe ĝin difektegos."

"Nu, se mi ĝin difektos—ĝi estas nur la posedaĵo de unu *Britisher*," respondis la aminda portisto kaj trankvile daŭrigis la difektigon. Por klarigi lian rimarkon mi diros ke Amerikanoj kutime ne uzas *ledajn* kestojn.

Ie mi legis recepton por frakasi ŝtonegojn. Enfaldatajn en pajo zorgege ilin enpaki en keston. Surmetu la surskribaĵon: "Facile rompebla; volu ekzerci la plej grandan zorgon," kaj forsendi la keston per vagonaro al la plej proksima urbo. Malferminte ĝin vi trovos ne ŝtonegojn sed polvojn.

La zorgego de tiu portisto kaŭzas ke preskaŭ mi tion kredas!

## LA HUNDO DE "BRISQUET."

(Eltirajo de Charles Nodier).—Tradukita de C. Leroux (Rouen).

En nia arbaro de "Lyons," ĉirkaŭe la vilaĝeto de "La Goupillière," tute apud granda putfonto kiu apartenas al la preĝejo de "Sankta-Martino," loĝis maljuna arbohakisto kiu estis nomita "Brisquet," aŭ, aliel, la fendiston je la bona hakilo, kaj kiu malriĉe vivis per la produktaĵo de siaj branĉfaskoj, kune kun sia edzino kiu estis nomita "Brisquette." Dio estis donita al ili du beletajn infanetojn: sepjaran knabeton kiu estis bruna kaj nomita "Biscotin," kaj sesjaran blondulineton nomitan "Biscotine." Krom tio, ili havis frizitharan hundon, tute nigran, escepte je la buŝego kiu estis fajrkolora; kaj ĝi estis certe la plej bona hundo el la lando pro sia alligiteco al siaj gemastroj. Oni nomis ĝin "La Bichonne," ĉar ĝi estis hundino.

Ĉu vi memoras pri la tempo kiam alvenis tiom da lupoj en la arbaron de "Lyons?" Estis dum la jaro de la densaj neĝoj, kiam la malriĉuloj devis vivi tiel malfacile.

"Brisquet," kiu foriris ĉiam al sia laboro kaj kiu ne timis la lupojn, dank' al sia bona hakilo, jamatene diris al "Brisquette":

"Edzino, mi petas vin ke vi ne lasu forkuri, nek 'Biscotin,' nek 'Biscotine,' ĝis kiam Sinjoro la estro de la lupkaptistoj estos veninta. Estus danĝere por ili. Ili havas sufiĉe por marŝi inter la malalta monteto kaj la laĝeto, de kiam mi plantis palisoj sur la bordo de la laĝeto, por antaŭgardi ilin de malfeliĉo. Ankaŭ, mi petas vin, 'Brisquette,' ke vi ne lasu forkuri 'La Bichonne,' kiu nur tion demandas."

Ĉiu matene, la saman aferon, "Brisquet" diris al "Brisquette." Iavespere, li ne revenis je la kutima horo. "Brisquette" alvenis al la sojlo de la pordo, eniris, reeliris, kaj, krucigante siajn manojn, diris: "Mia Dio! kiom li malfruigas!" Kaj poste, ankoraŭ ŝi eliris, kriante: "Eh! Brisquet!"

Kaj "La Bichonne" saltis ĝis ŝiaj ŝultroj, kvazaŭ ŝi volis diri: "Ĉu mi iros?"

"Paco!" diris al ŝi "Brisquette." "Aŭskultu, 'Biscotine,' iru ĝis la monteto por scii ĉu via patro revenas. Kaj vi 'Biscotin,' sekvu la strateton sur la bordo de la laĝeto, zorgante bone ĉu mankas palisoj, kaj fortaŭte krii: 'Brisquet! Brisquet! . . . Paco! la Bichonne!'"

La infanoj foriris, foriris rapide, kaj kiam ili estis renkontintaj sin je la placo kie kruciĝas la stratoj de la laĝeto kaj de la monteto, Biscotin diris: "Mi retrovos nian malfeliĉan patron aŭ la lupoj mangos min tie." "Ili mangos min ankaŭ," respondis Biscotine.

Dum tio ĉi, Brisquet estis reveninta per la strato de "Puchay" pasinte je la "krucio de la azenoj," apud la preĝejo de "Mortemer," ĉar li devis liveri dorskorbon da fasketoj ĉe Johano "Paquier." "Ĉu vi vidis niajn infanojn?" diris Brisquette. "Niaj infanoj?" respondis Brisquet; "niaj infanoj? Dio mia! ĉu ili foriris?" "Mi sendis ilin al via renkonto, ĝis la monteto kaj al la laĝeto, sed vi prenis alian vojon."

Kaptinte sian bonan hakilon, tuj, Brisquet forkuris al la monteto.

"Se vi prenis la Bichonne," kriis Brisquette.

La Bichonne estis jam malproksime; ŝi estis tiel malproksime ke baldaŭ Brisquet ne vidis plu ŝin. Kaj ĉiam li kriis: "Biscotin! Biscotine!" kaj neniu respondis. Tiam li ekploris ĉar li ektimis ke liaj infanoj estis perditaj.

Kurinta longe, tre longe, li ŝajnis ekaŭdi la voĉon de la Bichonne. Rekte en la densejon, li marŝis al la placo kie li estis aŭdinta ĝin, kaj levante sian bonan hakilon, li eniris. La Bichonne estis alveninta tien je la momento kiam Biscotin kaj Biscotine estis ĵus mangegotaj de granda lupoj; ŝi estis ĵetinta sin antaŭen, bojante por averti Brisquet per siaj bojoj. Per bato de sia hakilo, Brisquet mortigis la lupon, sed estis tro malfrue por la Bichonne; ŝi jam ne vivis plu.

Brisquet, Biscotin kaj Biscotine renkontiris al Brisquette. Estis granda ĝojo, sed tamen ĉiuj ploris; ĉiuj rigardoj serĉis la Bichonne. Brisquet enterigis la Bichonne en angulo de sia korto, sub multepeza ŝtono sur kiu la lernejestro skribis Latine:

"Tie ĉi estas la Bichonne, malfeliĉa hundo de Brisquet."

Kaj de tiu ĉi tempo, oni diras la sekvantan proverbon:

"Tiel malfeliĉa kiel la hundo de Brisquet kiu nur unu fojo foriris al la arbaro kaj kiun la lupoj mangis."

## LA PARADO ĈE SHERBORNE.

Originale verkita de H. W. Southcombe.

Multe da samlanduloj, kaj eble da alilanduloj, veturante la okcidentan marbordon, preterpasis tiun ĉi modestan urbon.

Eble ili ankaŭ ekrigardis la abatan-preĝejon kaj la pentrindan ruinan kastelon, kiuj estas la ĉefaj posedaĵoj de la urbo, kaj pri kiuj la loĝantoj havas grandan fieracon.

Kvankam la urbo havas nek tre multe da loĝantoj nek tro da riĉeco ĝi havas grandan kaj memorindan historion.

Estis en jaro 705 A.D. sankta Ealdhelm fondigis la urbon, la episkopan sidejon, kaj la lernejon, kiu lasta nuntempe atingis kaj subtenas tre altan rangon inter niaj grandaj publikaj lernejoj.

Car ĝi estas la 1,200 dat-reveno de ilia urbo la urbanoj havis tre indan ideon.

Ili diris: "Ni uzu la ruinan kastelon kiel scenejo, ni elektu kelkajn el niaj urbaj historiaj rakontoj, kaj faru kvazaŭ ekster-doman teatraĵon aŭ pris-kriban paradon."

Ili havis unufoje kiel samurbano S<sup>ro</sup> Louis N. Parker, kiu nuntempe estas unu el niaj plej bone konataj teatraĵo-verkistoj.

Li kore akceptis la ideon, verkis la necesan libreton, kaj entuziasme, senrekompence prenis sur si mem la gravan rolon de, "Estro de la ceremonioj."

Venante el Londono li laboris kune kun siaj gekunhelpantoj tage kaj nokte por sukcesigi la aferon.

S<sup>ro</sup> Walter Rhoades verkis la poeziojn kaj S<sup>ro</sup> Walter Raymond, okcidenta kampara viro, verkis la 9<sup>an</sup> scenon, pri la urba kaj monaĥa malamikeco. Tiu ĉi sceno estis ludita tute en la okcidenta dialekto kaj estis granda plezuro kaj amuzaĵo al multe da okcidentuloj revenante el malproksimaj lokoj, realdadi la bone konatan dialekton de ilia nask-lando

La verkistoj elektis la jenajn scenojn por prezenti al ilia aŭdonto:—

1. A.D. 705. La alveno de St. Ealdhelm.
2. A.D. 845. La malvenko de la Danoj.
3. A.D. 860. Morto de Ethelbald kaj alveno de la knabo Reĝo Alfred.
4. A.D. 998. Enkonduko de la *Benedictine* vivo-maniero de Episkopo Wulfay III.
5. A.D. 1075. Reĝ. William I. (*La venkanto*) translokigas la episkopan sidejon al *Salisbury*.

6. A.D. 1107. Roger of Caen, Episkopo de *Salisbury* kaj abato de *Sherborne*, fondigas la kastelon.

7. A.D. 1437. La malamikeco inter la urbanoj kaj la monaĥo kaj ekbruligado de la *preĝejo*. La *Morris* danco.

8. A.D. 1437. La fondigo de la maljunulejo, kiu ankoraŭ ŝirmas kelkajn maljunulojn kiuj partoprenis en la parado.

9. A.D. 1539. La elĵeto de la monaĥo.

10. A.D. La lernejo ricevas la oficialan regan aŭtoritaton.

11. Alveno de Sir Walter Raleigh. Danco cirkaŭ la Maj-stango.

La fina vidaĵo estis de du belaj blank-vestitaj junulinoj, sur estrado, unu estis la urbo *Sherborn* en Mass., Ameriko, la alia la urbo *Sherborne* en Anglujo. *Heraldo* legis amikan leteron de la Amerika *Sherborn* kaj kun muziko la ĉeestantoj pluvis rozojn sur ambaŭ figuroj.

Granda procesia marŝado de ĉiuj geaktoroj.

La soleno devis tute esti montraĵo de loka patriotismo sekve ĉiu aktoro devis mem aĉeti sian propran robon, devis esti loĝanto en aŭ apud *Sherborne* kaj devis doni senpage multe da tempo al sencesaĵo ripetadoj.

La rezultato plene montris ke ili ĉiuj malavare donis sian monon, tempon, kaj laboron.

Eĉ la vest-desegnoj, la kudrado, kaj parte la silka plektaĵo estis farita en la urbo de la urbanoj.

La plej grandaj roloj en la teatraĵo estis entreprenitaj de najbaraj grandsignoroj kaj la rolo de St. Ealdhelm de la ĉef-lerneŝto mem.

La aliaj 250 geaktoroj, unue difinitaj, frue plimultiĝis ĝis 850 kaj ili ĉiuj restis anonimaj.

La parado estis ripetita dum kvin tagoj, bonŝance sub brila sunlumo, kaj preskaŭ sen pluvo, kio estas, en nia klimato, la plej granda malhelpo kontraŭ ĉiuj ekster-domaj kunvenoj.

Dum la semajno la malrekta strateto estis plena je sunvarmitaj geturistoj, fervore demandante, "kie estas la kastelo, kie hotelo. Kie la bilet-oficejo," k.t.p. 10,000 vizitantoj trairis la preĝejon kaj 30,000 homoj kunvenis por vidi la teatraĵon. Subite la urbo vekigante trovis ke ĝi estis laŭte laŭdata, nek nur de la grandnombraj vizitantoj, al kiuj ĝi bone sukcesis doni tutan novan kaj ne-atenditan senton kaj ĝuaĵon, sed ankaŭ de la tuta

Brita gazetaro kiu donis al la afero longajn artikolojn kaj priskribojn. La supre-nomitaj historiaj okazoj prezentitaj tute senhalte okupis pli ol du horojn.

La komenco de la 1<sup>a</sup> sceno, kun eniro de heroldoj kaj trumpetistoj sekvataj de la kantistoj, estis tre impresa. Antaŭ ĉiu sceno aro de muzikistoj kaj kantistoj anoncis ĝian enhavon per priskriba kanto de dek aŭ dek-du linioj.

Estis tre bela vidi la aron de hele vestitaj geaktoroj kvazaŭ fluidiĝi kaj malaperi aŭ tra aŭ post la kastelo aŭ aliloke. Samtempe oni ekaŭdis la piedbaton de aliaj venontaj rajdantoj kaj la tinta-deton de malproksima armaĵo kaj armiloj kaj ekvidis la orajn, skarlatajn kaj multkolorajn robojn de la venontoj aperante kaj malaperante inter la arbegoj kaj amasoj de kreska verdaĵo.

Per feliĉa penso la aŭdintaro devis eniri al la sidejo tra la pordegoj de la parko, kiu ĉirkaŭas la modernan domegon, marŝi mallonge trans la mola torfo kaj poste tra longa serpenta vojo, sub ombro de multaj arbaraj grandeguloj laŭflanke de la lago.

Tia eniro povis bone agordi kaj trankviligi la animo. Kelkaj ĉeestantoj prave diris ke la atmosfero de la loko kaj de la tuta afero tute similis, nek tiun de la grandegaj paradaj vidaĵoj donitaj ĉe kelkaj Londonaj amuzejoj, nek tiun de la historia procesioj kiuj okazas ĉe kelkaj fremdaj urbegoj, sed ke ĝi pli similis la Oberammergaut festojn pro la naiveco kaj seriozeco kaj loka popola sindonemeco kaj koreco.

Sed kvankam serioza celo, kelk-foje preskaŭ religia, aperis tra la ceremonioj tre ofte okazis ridindaj amuzaĵoj. Precipe en la 9<sup>a</sup> dialekta sceno la aktoroj plene ludis ŝerc-maniere kun granda entuziasmo kaj gajeco.

En tiu ĉi *monaĥa kontraŭ urba* sceno la estro de la monaĥa partio estis granda buĉisto "kiu povis mortigi bovon per unu man-bato."

Tiu ĉi rolo estis entreprenita de grandega *Sherborne* buĉisto kiu plene plenumis la rolon.

Li humore senkulpigis sin, batalante por la abato kontraŭ sia samurbanoj, ĉar la abato aĉetadis grandan amason de viando "kaj neniam povis ĝi esti tro grasa."

La sceno finiĝis per apero de Robin Hood kaj siaj anoj kiu venkis la buĉiston kaj la monaĥaron kaj kiel fino la batalantoj cedis lokon al aro de belaj kaj gracilaj gedancistoj.

Estis la antikva *Morris dance*. Unue eniris kurioze vestita muzikisto kaj starigis sur barelon. Per unu mano li ludis tubeton kaj per la alia frapetadis malgrandan tambureton kune kun li, kiel amiketo, kuris per ŝanceliĝa irado, diableto, kaj dum la danco li sidigis kiel kontenta hundeto apud la barelo.

Tiu ĉi danco enhavas kelkaj dancantoj kiuj portas art-faritajn ĉevaletojn, kiujn ili igis fari gajajn petolaĵojn.

Post la ceremonioj la geaktoroj plenigis la scenejon kaj multe el ili iris hejmen en kostumo tra la malnovaj stratoj. Tie estis kavalirojn, militistoj, *Saxon* inoj kun altaj pintaj kap-ornamaĵoj, Danoj, monaĥoj, servistoj, episkopoj, gedancistoj, trumpetistoj kaj ĉia-speca mez-epoka sanktulo aŭ pekulo kiun oni povis imagi.

Kiam mi vespere en duon-lumeco pense hejmen reiris, kavaliro en ĉen-armaĵo ankaŭ peze kaj malrapide tra-rajdas la vojon.

Kiam en venonta tempo mi silente rigardos la malnovan kastelon aŭ preskaŭ sole vizitos la kvietan preĝejon, aŭ la stratojn de la urbo, mi aŭdos la tintadon de armaĵo kaj armilojn kaj spirite ree popolos la lokon je tiu unue vidinta bela, gaja, neforgesebla aro. La genio de la verkistoj kaj la lerta fervoro de la geaktoroj kelktempe vokis ilin el ilia muta reĝlando. Kiel ĉarma sonĝo ili aperis antaŭ niaj okuloj, kaj kiel sonĝo kiu tro mallonge daŭradis tiel rapide ili ree neniigis.

## LA GALANTO.

Originale verkita de Clarence Bicknell.

Je l' vintromezo, kiam frost' kaj ventoj batas  
Senĉese per sieĝo,  
Kaj la senviva ter' por sunolom' malsatas,  
Aperas unu flor', Galanto! ĝi kompatas,  
L'amiko de la neĝo.

Ĝis nun homsango pro batal', pro maljusteco,  
Kontraŭ al amoleĝo,  
La teron ruĝigadas; tial, per blankeco  
Ĝin benas la Galanto, floro da pureco,  
Spegulo de la neĝo.

El la kovrilo sur la ter', ĝi, senmakula,  
La sola floro reĝo,  
Leviĝas; kaj ekbrilas en l'aer' nebula  
Sen flora laŭdo, sen honoro kortegula,  
Venkinto de la neĝo.

Kaj ĝi, starante super tiu reĝkanapo,  
Kvazaŭ per kora preĝo,  
Rigardas; kaj humile al la naska drapo  
Sin klinas, per la blanka riverenca kapo,  
La ido de la neĝo.

## DIVERSAJ AVIZOJ.

Esperantistoj ĝoje ekscios ke D<sup>ro</sup> Zamenhof elektigis je la Legion d'Honneur. Ni esperas ke tiu ĉi estos nur la unua nacia honora kiu atendas nian eminentan majstron.

\* \* \*

*Tra La Mondo* estas la titolo de bela ilustrata Esperanta monata gazeto. La 2a & 3a numeroj enhavos longajn ilustritajn raportojn pri la Kongreso, laŭvortaj paroladoj, k.t.p.

Oni povas ricevi la tri unuajn numerojn sendante 2 fr. 25 al Administranto, *Tra la Mondo*, 15 Bvd. des deux Gares, Meudon, S. et O., France. Nia agema amiko, Kapitano Cape-Montrosier, estas la ĉef-redaktoro. Forlasinte Algerion, li petas, ke oni petu ĉiajn informojn pri la tieaj aferoj ne de li, sed de S<sup>ro</sup> Roux, Alĝero.

\* \* \*

La Sveda Ligo de junaj socialistoj decidas fondi internacian korespondadon, per Esperanto, kun la ĝejunulaj societoj de diversaj landoj. Interesatoj sin turnu al S<sup>ro</sup> Einar Hakansson, en Sodertelge, Svedujo.

\* \* \*

Tiuj kiuj deziras havi memoraĵon de la Kongreso devas sendi al la Sekretario de la Groupe de

Boulogne 2 fr. por ricevi la *Kongresa Liber*, Libro pri la Projektoj, Adresaro de multaj gekongresanoj, detala programo de la festoj, specimeno de la Karto de Kongresano & Kongresa Ilustrita Poŝtkarto, kun diversaj ĉirkuleroj. Adreso, S<sup>ro</sup> Paul Boulet, 49 rue Louis Duflos, Boulogne-sur-Mer.

\* \* \*

Oni proponas ke tiuj Fideluloj kiuj venis al la Unua Kongreso sekvu la ekzemplon de diversaj aliaj famaj fideluloj, kaj ĉiam portu verdan turbanon; se la ideo ne plaĉigas, eble speciale luksa verda stelo estos aprobinda!

\* \* \*

*Fundamento de Esperanto* estas tre belforma libro eldonita de la firmo Hachette, enhavanta 178 paĝojn (kosto 3 fr.) konsistas el Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro. Ĉiuj, kiuj ne jam havas tiujn verkojn aparte, devas posedi la novan verkon.

\* \* \*

La *Kristnaska Sonorado*, traduko de Dickens' *Christmas Carol*, nun aperis, kaj estas ŝatinda verko de 83 paĝoj, kosto 1 fr. 30. Alilandaj Esperantistoj ja kontentigos, legante por la unua fojo tiun ĉi ĉarmogan verkeston. Ni envas al ili la privilegion.

## VIRINO LA NEKOMPREENBLA.

El "De Omnibus," humora verko de Barry Pain.

Tradukis Geo. C. Law, kun afabla permeso de la verkisto, kaj T. Fisher Unwin, la eldonisto.

Mi ne komprenas la virinojn.

Antaŭ ne longe, mi okazis gajni duonan livron por veto je mia elekto en la "Grand National." Nu, la ideo prenanta min, mi eniris lokon iom superan je tiu kiun mi kutime favoras. Kiel mi diras, mi estis ĝuigonta min, tiel mi mendis mian bifstekon dikan, parte rostitan, kun iometo da grasaĵo, kaj mian glasegon da Burtona biero, kiel se mi estis la Ĉefurbestro mem. Tiam mi ĉirkaŭenrigardis.

Estis du virinoj kiuj ĵus estis finintaj. Ili estis sidantaj farante nenion. Estis kelnero kontraŭe je ili, sufiĉe proksima por povi mordi ilin, kaj li ankaŭ estis faranta nenion. Baldaŭ sinjoro alvokis lin, kaj li foriris. Tuj kiam li komencis servi iun alian, ambaŭ ili ekkriis "Kelnero!" kiel se ili ne havis liberan momenton. Baldaŭ li alvenis. Unu el ili diris, "Donu al mi la kalkulon, klnero." Li altlevis siajn ŝultrojn ĝis kie Angloe portus ĉapelon kaj komencis pretigi la kalkulon.

"Du da pano kaj du da butero," li diris.

"Tute ne!" diris la ulino. "Estas du da butero kaj unu da pano."

Li korektis kaj donis al ŝi la kalkulon.

"Ho, vi malsaĝulo!" ŝi diris. "Mi volas du kalkulojn. Mia sinjorina amikino pagos por ŝia." Tial li denove altigis siajn ŝultrojn ĝis ili preskaŭ formovis la tegmenton de la restoracio, kaj elskribis du kalkulojn. "Rigardu tie ĉi," diris unu el la virinoj; "vi kalkulas al mi viandon, kaj mi ne havis viandon."

"Jes," diris la alia, "kaj vi kalkulas al mi 'entrée,' kaj mi ne havis 'entrée.'"

"Estas tute same," diris la kelnero, "iu havis viandaĵon kaj iu havis 'entrée,' kaj ambaŭ kostas egale, kaj mi ne memoras kiu havis kian."

"Nu," diris unu el la ulinoj, "ni do devas interŝanĝi kalkulojn."

Kaj eĉ tiam ili ne estis kontentaj.

"Rigardu tie ĉi," diris unu el ili, "vi kalkulas al mi buteron kiun mi ne havis, kaj vi ne kalkulas al mi panon."

"La mia estas malkorekta ankaŭ," diris la alia virino, "ĉar li kalkulas al mi panon kiun mi ne havis, kaj forgesas pri la butero kiun mi havis."

La malfeliĉa fremda kelnero kvazaŭ kunligis siajn brovojn bante, penadante kompreni tion. "Vi diris al mi—unu da pano, kaj du da butero," li diris.

"Jes," diris ŝi, "sed mi intencis diri—du da pano kaj unu da butero—kaj iel vi devas kompreni sen sciigo."

"Ha!" diris la kelnero, "mi komprenas. Vi havis du da pano kaj unu da butero, almenaŭ via amikino havis." Tiam li aliigis la du kalkulojn, kaj konfuzis ilin pli ol antaŭe. Li disŝiris ambaŭ kalkulojn kaj denove komencis. Post ĉirkaŭ la tria atenco li aparte bilancis la kalkulojn por plaĉi ilin, kaj tiel baldaŭ kiel li faris tion, unu el la virinoj malfermis sian monujon kaj diris ke enfine ŝi pagos por ambaŭ, ĉar ŝi suldas al la alia tridek pencojn, kaj la dua kalkulo estanta tridek tri pencoj, se la alia pagos al ŝi ses pencojn, egaligos, ĉar ses kaj tri faras naŭ.

Nu, la kelnero foriris, treege ŝvitanta, kaj parolanta lingvon Italian, kun duonpenco kiel rekompenco. Tiam la du inoj komencis diskuti pri kiom ŝuldis unu la alian. Kia? Ne, mi ne restis por vidi la finon. Kiam mi eliris, unu el ili estis enpoŝiganta 127 pencojn kaj kulpiganta la alian pro ŝtelado, kaj tiu ĉi estis diranta, "Se mi reprenas la ŝilingon kaj la pencan poŝtmarkon kiujn mi donis al vi, kaj vi donas al mi la diferencon inter tio kion vi pagis kaj tio kion mi pagis hieraŭ, tiam vi ŝuldos al mi du pencojn, kaj mi bedaŭras ke vi iam estis mia amikino."

Nu, kiel mi diris, mi ne komprenas la virinojn.

Se mi devas fari malplaĉecon, mi pliamas malpacigi kun viro ol kun virino. Rilate virino, oni ne volas diri tion kion oni opinias—almenaŭ, esprimi ĝin laŭ la maniero oni alie dezirus. Mi havis bonan specimenon sur mia omnibuso antaŭ ne longe. Oni scias, ke en kelkaj veturejoj, pakaĵetoj da kakao estis donacitaj sur la omnibusoj. Tial, kompreneble, ĉiu virino alvenis je la konkludo ke tiuj ĉi pakaĵetoj estis disdonitaj ĉiutage kaj sur ĉia omnibuso. Tio estis la afero kun mia bonulino. Ŝi haltigis la omnibuson kaj supreniris.

Post iom da tempo mi sekvis ŝin por ricevi ŝian monon kaj doni bileton.

"Ho, vi agas malhonesteme!" ŝi diris.

"Kio estas via malsano?" diris mi.

"Kia," ŝi diris, "vi bone scias, kaj estas vane peni trompi min. Kie estas mia kakao?"

"Mi ne scias," mi diris. "Sed kiel ajn vi faris tion, vi ne faris tion per kakao."

Estas apenaŭ necese diri ke tiu ĉi sarkasma rimarko neatingis la celon.

"Mi scias ĉion pri tio," ŝi diris. "Vi devas doni al mi specimenon da kakao, kaj se mi konsentos trinki ĝin, mi povos veturi per tiu ĉi omnibuso senpage."

"Vi estas preskaŭ prava," mi diris, "sed ne tute prava. Tio kion oni donacas estas funto da teo, ekzemplero de la *Daily Telegraph*, kaj unua klasa bileto por Nov-Jorko. Sed ne sur tiu ĉi omnibuso,—alia omnibuso."

"Ho, nu," diris ŝi, "mi do estas sur la malprava omnibuso, kaj mi eliros."

"Vi povos fari tion," diris mi, "tuj kiam vi pagas vian monon."

"Kial," ŝi respondis, "oni ne devas pagi kiam oni eniras la malpravan omnibuson!"

"La omnibuso ne estas malprava," mi diris. "Estas vi kiu estas malprava. Se vi estas veturinta nur duoncolon per tiu ĉi omnibuso, mi devigus vin pagi."

Kaj ŝi pagis. Kiam mi eltrovas tiujn virinojn agantajn avare aŭ iom tro avare, estas ĝojo kaj plezuro se eble kapti ilin. Sed, kiel mi antaŭe diris, oni estas malhelpata; oni ne povas, se oni havas tiajn delikatajn sentojn kiel miaj, utiligi la saman riĉecon de lingvaĵo parolante al virino kiel parolante al viro.

Jes, ia viro ne volas esti iel malagraba al virino. Eĉ malnova Ike havas tian senton, kaj li tute ne estas sentemulo. Mi memoras ke fojon Ike iris al la vaksstatuejo de Sinjorino Tussaud, dum liber-tempa tago. Nu, li ne ŝatas trompigon. Tial li antaŭfaris kelkajn demandojn. Oni diris al li ke ĉe la enirejo de la salonego estis virino sidanta je ĉiu flanko kun tablo antaŭ ŝi, vendanta programojn, kaj katologojn, k.t.p. Unu el la virinoj estas reala, kaj la alia estas vaksa, metita tie kiel sorco, kaj li devos zorgi por ke li ne fariĝu malsaĝulo. Mi ne scias kiamaniere okazis, sed lia spirito konfuziĝis pri kiu tablo havis la realan virinon. Li alproksimiĝis la virinon kiun li imagis esti vaksa, levis manplendon da katalogoj kaj ekfrapis ŝian kapon per ĝi, dirante, "Se vi ne zorgas, iu forkuros kun tiuj ĉi." Kiam ŝi residiĝis kaj diris al li ke li devas hontiĝi, kaj se li ne zorgos ŝi forpelos lin,—neniam estis viro pli surprizata. Eble vi estos surprizata ankaŭ kiam mi diras ĝin, sed estas fakto, kiel li poste sciigis min,—li volis ke li ne estis farinta tiun eraron. Li diris, kaj estis eksterordinara konfeso por tia viro fari, ke se ŝi estus demandinta apologion li estus farinta tion!

Estas mirinde kiel kelkaj virinoj ne ŝajnas scii tion kio estas sia afero, kaj tion kio ne estas. Antaŭ ne longe, estis maljunulino sur mia omnibuso de tia speco—deziris sciigi ĉion pri ĉio.

"Kaj kiom oni pagas al vi, ĉiusemajne, mia viro?" ŝi demandis al mi.

"Tri ŝilingojn kaj ses pencojn," diris mi.

"Kia?" diris ŝi. "Ĉu tio estas ĉio kion vi ricevas?"

"Ho, ne!" diris mi. "Kompreneble, ni havas tion kion ni ŝtelas."

“Nu, nu!” diris ŝi, “mi ĉiam aŭdis ke la omnibusistoj rabis la kompaniojn. Kaj kiom estas la tuta sumo?”

“Sumas po 10 libroj ĉiusemajne,” diris mi, “sed ne estas por longa tempo. Post malmultaj monatoj, ni farigas eluzitaj.”

“Eluzitaj?” diris ŝi. “Kiel?”

“Respondante al demandoj de personoj pri aferoj kiuj ne estas iliaj aferoj, sinjorino.”

Nu, tio silentigis ŝin iom da tempo, sed, estu benata, si baldaŭ rekomencis! Ŝi estis unu el la naskitaj intervenantinoj, kiuj ne estas facile haltigeblaj. Tamen ŝi forlasis min. Estis sinjoro sidanta kontraŭ si, kiun ŝi poste ekzamenis, kaj mi simpatis je li. Ŝi demandis el kie li elvenis, kien li iras kaj kial li faras tion. Ŝi sciigis lin ke lia kravato ne estas rekta, kaj ke li estas malsaĝa veturante sen ombrelo. Ŝi devigis lin konfesi ke

li havas onklinon en lunatikejo, kaj ke li mem portis artefaritajn dentojn. Ŝi devigis lin rakonti al ŝi ĉion kion li precipe ne volis diri al ŝi. Kelkfojojn li klopodis forigi ŝin kaj legi la ĵurnalon, sed ŝi ne ĉesigis. Mi vidis ke li pli kaj pli maltrankviligis pro ŝi, kaj samtempe estis tro ĝentila doni al ŝi tion kion ŝi meritas. Fine li malespere ekspiris kaj saltis el la omnibuso, kun tri penca bileto, kaj ne eĉ dupenca veturado plenumita. Ĉar ŝi ne havis iun alian por enuigi, ŝi haltigis la omnibuson kaj eliris. Kiam mi laste vidis ŝin, ŝi estis parolanta al la policano ĉe la stratangulo. Kompreneble, ŝi eble estis petanta pri la vojiro, sed pli eble ŝi estis demandanta kion li havis por tagmangado, lastan Dimanĉon, kaj deviganta lin sciigi ŝin. Ŝi estis tia speco da virino.

(*Daurigota*).

## LA MALSANULETO.

De Georges Courteline, tradukita de D<sup>ro</sup> Philippet (Francujo).

*La kuracisto, la ĉapelon en mano.*—“Sinjorino, ĉu tie ĉi ne estas malsanuleto?”

*La patrino de l' malsanuleto.*—“Jes, tie ĉi, doktoro; eniru do. Ĝi estas mia knabeto. Imagu, ke tiu kompatinduleto, mi ne scias kial, de hodiaŭ matene, ĉiunmomente falas.”

“Li falas?”

“Ĉiunmomente, jes, doktoro.”

“Teren?”

“Teren.”

“Strange estas. . . . Kian aĝon li havas?”

“Kvar jarojn kaj duonon.”

“Eĉ se la diablo enmiksigus en tion, je tia aĝo oni staras sur la piedoj! Kaj kiamaniere komencis la afero?”

“Mi nenion komprenas pri tio,” mi diras. “Hieraŭ vespere li tre bone fartis kaj trotadis kunikle tra la apartamento. Hodiaŭ matene mi iras por levigi lin, kiel mi kutimas. Mi vestas al li la ŝtrumpojn, mi vestas al li la pantaloneton kaj mi ekstarigas lin sur liaj piedetoj. Puf! li falas!”

“Eble pro falsa paŝo.”

“Atendu! Mi eksaltas; mi relevas lin. . . . Puf! duan fojon li falas. Unuvorte, doktoro (mi ripetas, mi ne scias kial), de hodiaŭ matene, ĉiunminute li falas.”

“Tio estas iom mirinda. Ĉu mi povas vidi la malsanuleton?”

“Sendube.”

*La patrino eliras, poste reaperas portante la knabeton sur brako. Li vidigas sur la vangoj kolorojn atestantajn pri eksterordinara bonfarto. Li estas vestita per pantaloneto kaj kitelo tro larĝa, kiu estas kra-aŭ amelumita per sekifinta konfitajo.*

*La kuracisto.*—“Kia belega knabo! Metu lin teren, mi petas.” (*La patrino obeas. La knabo falas.*)

*La kuracisto.*—“Ankoraŭ unufoje, mi vin petas.” (*Sama scenludo kiel antaŭe. La knabo falas.*)

*La kuracisto.*—“Ankoraŭ.” (*Trian fojon la knabeto estas starigata sur la piedoj kaj ree tuj falas.*)

*La kuracisto revema.*—“Estas neaŭdite. . . .” (*Al la malsanuleto, kiun la patrino subtenas sub la brakoj.*)

“Diru al mi, amiĉjo mia, ĉu io vin doloretas ie?”

“Ne, sinjoro.”

“La kapo ne doloras vin?”

“Ne, sinjoro.”

“La pasintan nokton, vi bone dormis?”

“Jes, sinjoro.”

“Kaj vi havas apetiton hodiaŭ matene? Ĉu vi volonte mangus su-supeton?”

“Jes, sinjoro.”

“Tre bone (*kun kompetenta tono*). Ĝi estas paralizo.”

*La patrino.*—“Para. . . . Ho! Dio mia!” (*Li leras la brakojn al la ĉielo. La knabo falas.*)

*La kuracisto.*—“Ho ve! jes, sinjorino. Plena paralizo de la malsupraj membroj. Cetere vi tuj vidis mem, ke la muskoloj de la malsanuleto estas nun absolute sensentaj.” (*Dum li tiel paroladas, alpaŝinte al la knabo, li pretiĝas por furi la diritan eksperimenton, kiam subite*): “Ho! . . . Ho! . . . Ho! . . . Ho! . . . Ho! . . .”

*Poste eksplodante:* “Per la sankta Dio! Sinjorino, kion vi rakontas al mi pri via paralizo?”

*La patrino (miregigita).*—“Sed, doktoro. . . .”

*La kuracisto.*—“Mi ja nun komprenas, kial li ne povas resti stare sur la piedoj. Vi metis al li la ambaŭ krurojn en la saman kruringon de la pantaloneto!”



24. (Vol. II., No. 10.)

THE

Oktobro, 1905.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 15 cents).

Wholesale Agents: H. Gutter Temple, London, W.C.

All Communications should be sent to THE EDITOR, 27, Southampton Gardens Square, London, W.

## CONTENTS.

|  | PAGE |
|--|------|
| REPORT OF THE ECONOMIC LADDER PART<br>(A. Blain) .....                                     | 143  |
| RAYON FROM DEATH (Serial by General<br>George Cox) .....                                   | 149  |
| NOTES ON THE ORIENT, Part IV. (Col<br>H. K. Gordon) .....                                  | 160  |
| SOBRIETY NOTES .....   | 161  |
| WOMAN, THE INCORRECTIBLES (trans-<br>lated by G. C. Law), continued from<br>page 142 ..... | 162  |
| REMINISCENCES, Part X. (Edward<br>Mackillop, M.A., D.D.) .....                             | 174  |
| A PRIMER FROM DANKMIST (translated<br>by R. Frankel) .....                                 | 180  |
| THE WIFE IS DEAD (translated by A.<br>Balsani) .....                                       | 180  |
| THE OAK AND THE BIRD (translated<br>from La Fontaine by A. Miltner) .....                  | 187  |
| ARTHURIANE DEAMONO (Margie<br>Weston) .....  | 193  |
| A TACK STONE (P. Chalmers Taylor) .....  | 193  |
| NOTES ON THE ARTS (Walker Dexter,<br>R.R.A.) .....   | 199  |
| A SNOW PEAR, Poem (translated by<br>J. Tarsell) .....                                      | 199  |
| FROM SMITH'S (C. A. Meigh) .....   | 199  |

MARKED DÉPOSÉ,  
No. 2282.

## THE ESPERANTO BLEND.

Registered Trade Mark, No. 270,048.

\* Registered Label, No. 271,454.

THE ESPERANTO BLEND is a new mixture of  
the finest Whiskies from the Highlands of Scotland,  
and is of special interest to Esperantists, as the label  
has been designed to serve as a "propaganda." A  
label CARD, 100,000,000 will be allowed to some  
fine Esperantists who comply with the conditions,  
which can be ascertained on application to the sole  
Importers—

BUCHANAN, SCOTT & CO.,

Garthland Street, Glasgow,  
Scotland.

TRADE MARK: "ESPERANTO, GLASGOW."

## ĈIUJ, NI POVAS PARADIZON IRL.

|                    |                      |
|--------------------|----------------------|
| Wie kann ich Ihnen | La ĉiuj, ni povas    |
| The Irish Harpist  | Ni, ni ĉiuj ni povas |
| Wie kann ich Ihnen | Wie können Sie Ihnen |
| The Irish Harpist  | Wie können Sie Ihnen |
| The Irish Harpist  | Wie können Sie Ihnen |
| The Irish Harpist  | Wie können Sie Ihnen |

Posto: 1. und 2. Klasse...  
 No. 12, Adress: via Mercury (S. & L.) France

## The "Review of Reviews"

Is the Best Magazine for Busy People  
 and it is read by "Exasperated" Students

Two copies of this Magazine is in every library of the world.  
 The Review of Reviews is the only magazine that is read by  
 every student in every university in the world.

Post Free for Twelve Months 6/6  
 10 B. 10 St. St. 10 London

Order: BROWNE & CO., 10 B. 10 ST. ST. 10 LONDON

### ESPERANTIST ARBEITEN

in Title of the B.C.A. Series: "Weilberg,"  
 "Weilberg," Roberton Terrace,  
 HASTINGS, England

Special inclusive Weillberg Terms for Esperantists, etc.

### KOLEKTANTOJ

Finlandaj postmarkoj, 20 rubandoj, blankite,  
 per 1m 50 postmarkoj (25, 40, 50, 60, 70, 80, 90, 100), 20 mal-  
 similaj por 2m. (2/3, 4/3, 5/3, 6/3, 7/3, 8/3, 9/3, 10/3). Pagon sola  
 sendi per postanordato. Ĉiuj postmarkoj  
 akceptaj laŭ efektiva valoro.

ROOLF HEINBERG, QUINLANSHAW, 26, FINLAND

### Correspondence Lessons in Esperanto

and German  
 M. A. BENTON, 115, Southview Street, Forest Hill,  
 London, E.

### AL STUDENTOJ CIVILANAJ

Esperanto estas la lingvo de la homoj.  
 Ĉiuj homoj devas lerni Esperanton.  
 Ĉiuj homoj devas lerni Esperanton.  
 Ĉiuj homoj devas lerni Esperanton.

Esperanto is the language of the future.

## Adresareto de Personoj kiuj deziras Korespondadi

- Sra. D. DAVENPORT, Casilla 17, La Paz, Bolivia, S.A. - Desiras korespondi kun Esperantistoj.  
 Sra. E. HAZONK, Box 211, Three Rivers, Canada. - Desiras korespondi kun Esperantistoj.  
 Sra. PAUL. HOLLANDER, Rossmann Str. 20, Stuttgart, Germany. - Desiras korespondi kun Esperantistoj.  
 Sra. K. W. KESKINEN, 147, Mary Road, Leicester. - Desiras korespondi kun Esperantistoj.  
 Sra. W. MILLS, Ingham, 99, Station Road, Newcastle, Notts. - Desiras korespondi kun Esperantistoj.

La Koro de la Koroj estas 60. 700. postmarkoj

# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Bro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

**N.B.**

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

**N.B.**

24. [Vol. II., No. 10.]

OKTOBRO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## SCIIGO PRI LA DUA PARTO DE LA KONGRESO.

Verkita de Arthur Blott.

*Lundo, Aŭgusto 7.*—La Granda Balo en la Kazeno je la vespero de la 7<sup>a</sup> estis grandega sukceso. La vasta salonego difinita por la ceremonio, kvankam taŭga pro aliaj aferoj, ja estis tro malgranda por la multenombraj gaje-vestitaj Esperantistoj, kiuj kunvenigis por dancadi kaj ekzameni la fantaziajn kaj naciajn vestojn per kiuj kelkaj inter ilia nombro vestiĝis. Oni estis petinta ke la ĉeestantoj venu en kostumoj indikantaj iliaj nacieco aŭ loko, kaj kelkaj Esperantistoj kompleze tion faris. Plej notinde inter la fantazi-vestoj estis tiu de Angla fraŭlino kiu reprezentis Britannia, kun kasko kaj ŝildo konvenaj, kaj longa ruĝa-kaj-blanka robo. Skotlando estis reprezentata de sinjoro kaj fraŭlino, ambaŭ vestitaj en tartano. Unu sinjoro aperis en la vesto de Alĝera Arabo, kaj du junaj knabinoj vestitaj laŭ Turkinoj estis tre imponaj. Juna fraŭlino vestita kiel Hispanino el Catalonia, Sveda fraŭlino en plena nacia vesto, kaj Svisa knabo estis speciale ĉarmaj. Ĉi tie kaj tie oni renkontis beletajn knabinojn vestitaj kiel Bulonjaj fiŝist-edzinoj, kaj kamparanoj el Holando aŭ Britanujo.

La kunvenintaj gastoj energie dancadis, sed malfacile, pro la multenombra ĉeestantaro, kaj la programo diversiĝis per malvarmetaj promenadoj en la ĝardenoj, aŭ vizitoj en la apudajn restoraciojn, aŭ per rigardado de la vet-ludantoj ĉe la hazard-tabloj. Je la eniro de D<sup>ro</sup> Zamenhof, kondukata de la Gesinjoroj Michaux, la orĥestro ludis "La Marseillaise," kaj la gastoj aranĝis sin en duobla vico meze de la salonego kaj krie aplaudis la

*Monday, 7th August.*—The Grand Ball in the Casino on the evening of the 7th was a huge success. The large hall appropriated for the purpose, though suitable in other respects, was far too small for the numerous gaily-dressed Esperantists who assembled to dance and inspect the fancy and national costumes in which some of their number were dressed. Those attending had been requested to come in costumes indicative of their nationality or locality, and a fair number of Esperantists had complied. Foremost amongst the fancy dresses was that of an English young lady who appeared as Britannia, with helmet and shield correct, and a flowing robe of red and white. Scotland was represented by a lady and gentleman, both in tartan costume. A gentleman appeared in the costume of an Algerian Arab, and two young girls dressed as Turkish ladies were extremely effective. A young lady dressed as a Spanish girl from Catalonia, a Swedish girl in full national costume, and a Swiss boy were particularly charming. Here and there one ran against pretty girls representing fishwives of Boulogne, and peasants from Holland or Brittany.

The assembled guests danced energetically, but with difficulty owing to the numbers present, and the programme was varied by cool walks in the grounds or visits to the adjoining restaurant, and by watching the players at the gaming tables. On the entrance of Dr. Zamenhof, led by M. and Mme. Michaux, the orchestra played "The Marseillaise," and the guests formed a double line down the middle of the hall and cheered the little

Doktoron kaj lia edzinon promenadantajn ĝis seĝoj sur la altigita estrado ĉe la alia fino. Diversaj amikoj prezentigis al li, inter ili kelkaj ĉarmaj knabinoj, el kiuj unu deklamis al li iujn versaĵetojn Esperantajn.

El la okazoj de la vespero, unu el la plej interesa estis Ĉirkasja nacia danco de du prave vestitaj geesperantistoj el tiu regiono.

*Mardo, Aŭgusto 8.*—La Mard-matena Kunveno en la teatro estis bone ĉeestata, kaj lerte prezidata de Rektoro Boirac, de la Diĵona Universitato, maldekstre de kiu sidigis D<sup>ro</sup> Zamenhof, kaj eminenta Esperantistaro troviĝis sur la estrado. Akra disputado pri la dezirindeco de la proponita *Esperanta Ligo* okazis, kaj multaj opinioj esprimigis. Sed la kunveno ja estis interesega eĉ por la neesperanta animo, ĉar ĝi ilustris la praktikecon de Esperanto kiel internacia komprenilo; ĉar ĉi tie oni aŭdis gesinjorojn el diversaj landoj nur iomete, aŭ tute ne, komprenante diversajn lingvojn, klare kaj senhalte esprimi siajn ideojn en publika konstruaĵo, kaj nepre esti instante komprenataj de la aŭskultantoj. La disputado estis lerte daŭrigata, kaj ofte oni vidis du aŭ eĉ pli da Esperantistoj stari kaj alteteni manon, kriante al la Prezidanto: "*Mi petas paroladon.*" Oni nenion decidis, ĉar ne estis la intenco de la kunveno-organizintoj plu fari je tiu ĉi okazo, ol nura disputado.

Tiun posttagmezon la Kongres-agado refreŝigis per plezurplena ekskurseto al la vilaĝeto *Le Portel*, ĉirkaŭ du mejloj malproksime, per la marbordo. Esperantistoj kunveniĝis ĉe la teatro, kaj promenadis laŭlonge la havenon kaj krutaĵojn, amike babiladante kara-lingve. Ĉe *Le Portel* oni vidis gebanantaro kaj siaj tendetoj, kaj la sablaĵo kovriĝis de infanoj, ĝuadante sin laŭ la kutima maniero. Kelkaj Esperantistoj allogiĝis de la akvo, kaj aliĝis je la gebanantaro. Aliaj vizitis la vilaĝon kaj kafejojn, kaj poste S<sup>ro</sup> Michaux anoncis la reven-tempon. Malmultaj elektis reveni trame, sed ĉiuj ŝajne pasigis tre ŝatatan posttagmezon.

Teatre, ĉe la vesper-kunveno, S<sup>ro</sup> Boirac prezidis, kaj la paroladoj klopodis pri la *elparolada demando*, kaj oni donis specimenojn de la ĝusta Esperanta akcento. Oni treege esperis ke Esperanto baldaŭ estos instruata en la lernejoj kaj kolegioj, kie, pro ĝia gramatika simpleco, kaj la logikeco de ĝia strukturo, ĝi fariĝos gravega ilo por edukadi la junan animon.

Doctor and his lady as they walked to a seat on the raised platform at the other end. Several friends were presented to him, including some little girls, one of whom recited some Esperanto verses to him.

One of the most interesting events of the evening was the execution of a Circassian national dance by a lady and gentleman from that region, appropriately dressed.

*Tuesday, 8th August.*—The Convention on Tuesday morning, held in the theatre, was well-attended, and ably presided over by M. Boirac, Rector of Dijon University, Dr. Zamenhof sitting on his left, and a number of distinguished Esperantists were on the platform. A keen discussion as to the propriety of the proposed Esperanto League and kindred subjects took place, and many opinions were expressed. But the meeting was extremely interesting even to the non-Esperantic mind, as illustrating the practicability of Esperanto as an international medium of expression; for here one heard ladies and gentlemen from various countries, having little or no knowledge of each other's language, clearly and fluently expressing their ideas in a public building, and being evidently promptly understood by those listening. The discussion was well-sustained, and one often saw two or more Esperantists on their feet holding up a hand and crying to the chairman: "*Mi petas paroladon.*" No conclusions were arrived at, it not being the intention of the organizers of the meeting to proceed further than a discussion on that occasion.

That afternoon the business of the Congress was varied by a pleasant trip to the little village of *Le Portel*, some two miles along the coast. Esperantists assembled at the theatre, and walked by the harbour and along the cliffs, engaging in friendly conversation in the *Lingvo*. At *Le Portel* were to be seen a crowd of bathers with their tents, and the sands covered with children enjoying themselves in their usual way. A few Esperantists were attracted by the water, and joined the bathers. Others inspected the little town and cafés, and then M. Michaux announced the homeward journey. A few preferred to return by tram, but all appeared to have spent a very enjoyable afternoon.

At the evening meeting in the theatre that day M. Boirac presided, and the discussion turned upon questions of pronunciation, and examples were given of the precise Esperanto accent. Strong hopes were expressed that Esperanto would soon be taught in the schools and colleges, where, on account of the simplicity of its grammar and the logicalness of its construction, it would be an invaluable element in the training of the youthful mind.

*Merkredo, Aŭgusto 9.*—La Kunveno daŭriĝis Merkreton, sekvata de vespera koncerto, kiam tre interesa humora ludo, titolata "Edziniĝo per Telefono," ludigis de du Parizanoj. Al rigardanto ŝajnis ke ili ambaŭ parolis en sia nacia lingvo, tamen efektive nur en Oktobro de la lasta jaro ili ekstudis Esperanton! Jen denove la praktikeco de Esperanto pruviĝis.

*Ĵaŭdo, Aŭgusto 10.*—Granda nombro da Geesperantistoj partoprenis je la amika enkurso en Anglujon, kiun aranĝis la Bulonja Napoleono de Esperanto, Maître Michaux, kaj liaj kolegoj. Surirante la ŝipon *Onward*, kiu portis la Esperantan flagon ĉe la mast-supro, ili ekvojaĝis Folkestonen. La mar-trans-iro estis sufiĉe trankvila, kaj ŝajne preskaŭ ĉiuj Esperantistoj restis sur la ferdeko. Tamen D<sup>ro</sup> Zamenhof, kies ĝi estis la unua sur-mara vojaĝo, elektis resti en la kajuto kaj konservi sian forton por la sekvanta parto de la programo de la tago.

Alvenante ĉe Folkestone, la loka grupo kunveniĝis, kaj ĝia prezidanto legis bonvenigan paroladon al D<sup>ro</sup> Zamenhof, kiu respondis. La Esperantistaro tiam marŝis en la urbon, furagiĝis en diversaj restoracioj, poste kunveniĝis ĉe la Urbestrejo je la tria horo, kiel estis aranĝite. Tie okazis oficialan akceptadon de la Urbestro, kiu bonvenigis D<sup>ro</sup> Zamenhof per taŭga Angla parolado, tradukita en Esperanton de S<sup>ro</sup> Finez (Dover). D<sup>ro</sup> Zamenhof respondis, kaj la toasto de "Lia Reĝa Moŝto" kaj aliaj toastoj sekvis. Forlasinte la Urbestrejon, la aro eriĝis sur la *Lees*, admirante la plej belan parton de Folkestone, kaj fine kunvenante ĉe la stacidomo por amastiĝi en rapidegan vagonaron al Dover. Tie la loka grupo renkontis nin ĉe la stacidomo, kaj ankaŭ tie la Doktoro bonveniĝis de novaj aliĝantoj. Je la naŭa horo, en la Konsilanta Ĉambro, laŭ la programo, Sir William Crundall, la Urbestro de Dover, akceptis D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj la Esperantistoj. Tiu ĉi ne estas la unua fojo kiam tiu ĉi antikva Ĉambrego pleniĝis de niaj samideanoj, kaj kiam paroladoj, kaj toastoj aŭdigis per la Internacia Lingvo. Ĉampanvino kaj refreŝigoj estis ĉirkaŭirigitaj, kaj parolado kaj kantado pasigis por la kunvenintoj tre plezurplenan horon kaj duonon. Tiam kelkaj amikoj forveturis al Calais sur la nokta-ŝipo, kaj aliaj restis en Dovero por vidi iom plu de la urbo en la mateno.

*Vendredo, Aŭgusto 11.*—La Esperantistoj kolektiĝis sur la *Admiralty Pier* (Elŝipirojo) por vidi la grandegan ŝipegon *Deutschland*, kiu estis alligita tie, kaj kiu iom poste forvojaĝis, portante multajn

*Wednesday, 9th August.*—The Convention was continued on Wednesday, followed by a concert in the evening, when a very interesting comic play, entitled "Edziniĝo per Telefono," was performed by two gentlemen from Paris. To the onlooker it would have appeared that they were speaking in their own language, whereas, in point of fact, only in October of last year did they turn their attention to Esperanto! Here again was the efficiency of Esperanto demonstrated.

*Thursday, 10th August.*—A large number of Esperantists took part in the friendly invasion of England, which had been planned by the Boulogne Napoleon of Esperanto, Maître Michaux, and his colleagues. Going on board the ship *Onward*, which carried the Esperanto flag at her masthead, they started for Folkestone. The passage was fairly calm, and it appeared that nearly all the Esperantists remained on deck. Dr. Zamenhof, however, whose first sea-trip this was, chose to rest in his cabin and reserve his strength for the latter part of the programme of the day.

On arriving at Folkestone, the local group met us, and its President read an address of welcome to Dr. Zamenhof, who replied. The band of Esperantists then marched up into the town and sought refreshments in various cafés, afterwards assembling at the Town Hall at 3 o'clock, as arranged. There a formal reception was given by the Mayor, who welcomed Dr. Zamenhof with an appropriate speech in English, translated into Esperanto by Mr. Finez (Dover). Dr. Zamenhof replied, and the toast of "The King" and other toasts followed. Leaving the Town Hall, the party scattered over the Lees, admiring the best part of Folkestone, and eventually assembling at the railway station to crowd into the express train to Dover. Here the local group met us at the station, and here again the Doctor was welcomed by new disciples. In the Council Chamber at the Town Hall, at 9 o'clock, according to programme, Sir William Crundall, the Mayor of Dover, welcomed Dr. Zamenhof and the Esperantists. This is not the first time that this venerable Chamber has been filled by our samideanoj, or that speeches have been made there, and toasts proposed in the Internacia Lingvo. Champagne and refreshments were handed round, and speeches and song helped the assembled guests to pass a very pleasant hour and half. Then some of the friends departed for Calais by the night boat, and others remained in Dover to see something more of the town the next morning.

*Friday, 11th August.*—The Esperantists gathered on the Admiralty Pier to see the huge ship *Deutschland*, which was moored alongside, and which shortly departed, bearing a large number

elmigrantojn kaj aliajn en Amerikon. La energiuloj tiam vizitis Dover Kastelon, kaj fine suriris la tag-mezan ŝipon al Calais. Tie alveninte, tre kora akcepto doniĝis de la tiea forta grupo. Ni vizitis la Elektran Pov-domon kaj la Komercan Ĉambron, kie okazis bone aranĝita kunveno. Ĝentilaj paroladoj aŭdiĝis, kaj afablecoj interŝanĝiĝis laŭ la maniero en kiu niaj Francaj amikoj superas. La grupo tiam disiĝis por viziti la urbon, kunveniĝi ĉe la Kazeno, kaj fine ĉeesti la Muzik-Salonegon ĉe la Kazeno, kie, krom la ordinara programo de la vespero, oni estis aranĝinta interludon nur por Esperantaj verkoj. Vagonaroj reportis nin malfruege en Bulonjon.

*Sabato, Aŭgusto 12.*—Nenia programo estis difinita por la mateno kaj posttagmezo, pri kio la vizitantoj sekvis siajn proprajn inklinojn ĝis la vespero, kiam ili rekonveniĝis en la teatro por mallonga ĝis-la-revida-koncerto je la honoro de la Doktoro. Ĉe tiu ĉi koncerto, kiu estis tre mallonga, kelkaj infanoj partoprenis, kaj tre ĉarme deklamis Esperantajn poemojn. Tiam kvar el ili donis grandegan floraron al S<sup>rino</sup> Zamenhof. Invitata de S<sup>ro</sup> Michaux, la aro tiam iris al la apuda kafejo por trinki adiaŭan ion kun la Doktoro kaj Doktoredzino.

*Dimanĉo, Aŭgusto 13.*—Tagmeze la Esperantistoj kunvenis ĉe la Centra Stacidomo por forsendi la Gesinjorojn Zamenhof je ilia revena veturado hejmen. Por homoj kiuj kutimiĝas je vivado tre trankvila la ekscitiĝo de la lasta semajno devas esti estinta tre taksanta por ili, kaj ni kredas ke, kvankam kontentegaj pro la nedubbla sukceso de la tuta Kongreso kaj ĉarmataj de la korega akceptado kiun ili ĉie ricevis, ili devas multe kontentiĝi, revenante al la trankvileco de ilia Varsovia hejmo.

Tiun posttagmezon, sub la kondukado de M<sup>o</sup> Michaux, Esperantistaro vagonare veturis al *La Arbaro*, kaj marŝis sur verdaj vojetoj kaj foliplenaj ombrejoj al nevizitata loko. Tie la nemetiaj fotografantoj ofte vidiĝis, tiel kiel ja estis okazinta dum la tuta daŭro de la Kongreso, kaj la multegaj grupetoj da Esperantistoj famigitaj de la fotografilo devas esti nekalkuleblaj. Nenia espero por ke ia Esperantisto estonte penados pruvi ke li *ne* ĉeestis la unuan Kongreson! La atestoj kontraŭ li ja estos subpremigitaj. La ŝatinda promenado daŭriĝis ĝis la vilaĝo *La Capelle*, teo kaj manĝaĵoj riceviĝis ĉe kafejo, kaj la familio revenis domon vagonare.

Tiel finiĝis ago-plena semajno, plena je grava klopodado kaj multe da agrablega ekscitiĝo.

of emigrants and others to America. The energetic ones then visited Dover Castle, and eventually went on board the mid-day boat for Calais. Arriving there, a very cordial reception was given by the strong group there. The party then visited the Electric Power House and the Chamber of Commerce, and there a nicely arranged reception took place. Polite speeches were made and courtesies exchanged in the manner in which our French friends excel. The party then scattered to inspect the town, to gather at the Casino, and eventually to attend the Music Hall at the Casino, where, in the evening's programme, an interlude had been arranged for Esperanto pieces only. Late trains conveyed us back to Boulogne.

*Saturday, 12th August.*—No programme for the morning and afternoon had been arranged, so the visitors followed their own devices until the evening, when they assembled again in the theatre for a short farewell concert in honour of the Doctor. In this concert, which was a short one, several children took part, and recited very prettily some poetry in Esperanto. Then four of them handed a huge spray of flowers to Madam Zamenhof. On the invitation of M. Michaux, the assembly then adjourned to the adjoining café to drink a farewell cup with the Doctor and his wife.

*Sunday, 13th August.*—At mid-day the Esperantists assembled at the Central Station to give the Doctor and his lady a good send-off on their return journey home. For persons who are used to a very quiet life the excitement of the last week must have proved somewhat trying to them, and we think that although pleased with the undoubted success of the whole Congress and charmed with the cordial reception they had everywhere met, they must feel considerable satisfaction in returning to the quiet restfulness of their home in Warsaw.

That afternoon, under the guidance of M. Michaux, a party of Esperantists took the train to the Forest, and tramped through green pathways and leafy glades to a secluded spot. Here the amateur photographers were very much in evidence, as indeed they have been all through the Congress, and the number of groups of Esperantists immortalised by the camera must be legion. No hope for any Esperantist on any future date to try and prove that he was *not* at the first Congress! The evidence against him would be overwhelming. The pleasant walk was continued to the village of La Capelle, tea and refreshments obtained at a café, and the party returned home by rail.

So ended an eventful week, fraught with serious business and much pleasurable excitement.

## SAVITA DE MORTO.

Originale verkita de Generalo George Cox.

## ĈAPITRO VI.

“Mi arestas vin pro la mortigo de Vilhelmo Thompson,” diras raŭka voĉo ĉe mia orelo, kaj samtempe mi sentas ke mia ŝultro estas malĝentile skuata.

“Vilhelmo kiu?” mi murmuris sonĝe.

“Vilhelmo Thompson,” ripetas la voĉo.

Ploreanta krio aŭdiĝas en la koridoro; la pordo duonmalfermiĝas, kaj mia patrino ekkrias “Mia knabo! mia knabo! mia karega knabo!”

“Mi bedaŭras, sed vi ne povas eniri, sinjorino,” diras voĉo ĉe mia kubuto, kaj la pordo estas fermata kaj ŝlosata.

La voĉo de mia patrino revekas min al konscienco, kaj mi ĉirkaŭrigardas la ĉambron. La posttagmeza suno hele enfluetas tra la fenestroj. Apud mia lito staras policano, kaj sekretpolicisto en civila vestaĵo.

La plena terureco de mia situacio min ekkaptas, kaj mi levas min de la lito kun ĝemo de malespero.

“Nun, sinjoro, se plaĉos al vi, leviĝu kaj vestigu, kiel eble plej rapide; fiakro atendas ĉe la pordo,” diras la policano.

Preskaŭ nekonscie mi leviĝas kaj komencas min vesti.

“Atendu momenton!” diras la sekretpolicisto, “Permesu al mi ekzameni tiun pantalonon kaj veston, antaŭ ol vi surmetos ilin?”

Li ŝovas la manon en la poŝojn, kaj elprenas diversajn aĵetojn unu post la alia.

“He! *du* monuoj! Ne multe en tiu ĉi!” li daŭrigas, malplenigante la enhavon sur la tualet-tablon.

“Ha! kio estas tio ĉi?” li ekkrias, ekzamenante la alian. “Tricent livra bankbileto! Ĝuste la sumo! Atesto sufiĉa, tie ĉi, kio ajn okazos!”

Mi estas simple terurigita de mirego! *Du* monuoj! kaj unu enhavanta tricent livran bankbileton! Kiamaniere ĝi povis eniri tien? “Ĉielo!” mi ekkrias, “mi devas esti preninta ĝin de la sidejo, erare por la mia!”

“Mi devas averti vin, sinjoro, ke ion, kion vi diras oni povos uzi kiel atesto kontraŭ vi,” diras la sekretpolicisto.

Mi ne faras respondon, sed tute eluzata en spirito kaj korpo, mi finas vesti, kaj tiam diras, ke mi estas preta.

“Mi bedaŭras, sinjoro, sed estas mia devo,” diras la policano, elmontrante paron da mankatenoj.

Mi etendas la manojn: la feraĵoj estas lerte alligataj, kaj ni eliras la ĉambron, la policano antaŭiranta kaj la sekretpolicisto sekvanta min.

Dum ni trapasas la koridoron, mia malfeliĉega patrino kaj miaj fratinoj ĉirkaŭprenas min freneze, kaj iliaj ploregoj estas korsirantaj.

“Unu parolo, antaŭ ol vi foriros, mia karega knabo,” diras mia ploreganta patrino; “Diru, ho! diru al mi, ĉu tiu ĉi terura kulpigo estas iel vera?”

“Vere estas, mia kara patrino, ke mi trovis min en la vagono kun la malfeliĉulo, sed neniam faro mia kaŭzis lian morton; li pafis sin hazarde.”

“Dankon al Dio,” ploregas mia patrino, donante al mi unu lastan, amindan, daŭrantan kison.

Mi pasas tra la dompordo, eniras la fiakron, kaj ni forveturas. . . .

## ĈAPITRO VII.

“Kiel vi decidis, ho juĝantaro? Ĉu vi trovas la kulpigito kulpa aŭ senkulpa je la krimo de mortigo?”

“Kulpa,” respondas la juĝantestro, en silento tiel profunda en ĝia egeco, ke la plej mallarĝa murmurado de iu el la amaso de homoj kiuj plenigis la juĝejon, estus estinta klare aŭdebla.

Nepriskribebla sono, simile al murmuro de miksitaj doloro kaj liberspirado post longa necerteco, leviĝas el la homamaso, kiu plenigis la juĝejon; kaj tiam reĝas ega silento.

La juĝisto ekrigardas min momente, kiel mi staradas en la kulpulejo, kaj tiam en voĉo tremanta de kortuŝeco, parolas jene:—

“Francesco Middleton,—Vi estas trovita kulpa je la krimo de mortigo, per juĝantaro de viaj samlandanoj. Estis dum neniam subita frenezkolero, ke vi faris la kruelecan agon, ĉar estas pruve per la plej klara atestado, ke via celo estis rabado; kaj pro tio, vi ne ŝanceliĝis oferi la vivon de tielulo via. Via advokato en sia lertega parolado, penis alkonduki la juĝantaron doni juĝon, ke vi ne estas respondebla pri viaj faroj pro frenezeco, sed li ne povis produkti ion por subteni tiun pretendon, kaj la juĝantaro estis tute prava ne influigi per lia elokventeco. Nur restas al mi la devo dolora elparoli la solan sentencon, kiun permesas la leĝo. “Ĉu vi havas ion por diri, kial la mortsentenco ne estu elparolata?”

(*Daŭrigota*).

## ORIENTAJ MEMORAĴOJ.

Originale verkita de Kolonelo H. K. Gordon.

Dum la tri-taga vojiro de "Hongkong" al "Shanghai," la temperaturo ŝanĝis en vera malvarmeĝo.

Tiu ĉi internacia urbo estas kelkaj mejloj de la enfluo de la granda rivero, la "Yangtsekang," kaj tie oni nin kondukas per vaporŝipeto. Se vi loĝas ĉe la Klubo, vi ĝin trovos la plej komforta ie orientflanke de "London."

Sur la mangotablo troviĝas ĉiaspeco de ĉasaĵo: fazano, leporo, cervajo, sovaĝanaso, skolopo, kaj skolopeto; la tagmezmanĝo daŭras ordinaro de tagmezo ĝis la dua kaj multe da negocistoj alestas, kvazaŭ ĉe vera Borso.

Malmulte da mejloj ekster la urbo estas tiu bona orienta institucio, la Kampa-klubo, kie oni veturas vespere por lud-tempo.

Vinberoj estas tre oftaj, kaj por tia kaŭzo tro malkaraj: la Ĥinoj ilin antaŭgardas en silojn por ilin konservi. Oni trovas strangan puŝ-veturilon de nur unu rado, uzata por homoj, kaj pakaĵoj. La utilaj Ĥinaj ĉevaletoj ja ne estas belaj, sed ili povas porti grandan pezon: kaj, plue, galopi ĉe kursoj pli rapide ol oni kredus. Vintra-sezonaj partioj ekskursas per kanaloj kaj riveroj sur loĝboatoj por ĉasi.

Pasante preter la insulo de "Quelpart," apartenanta al "Korea," ni trairis la markolojn de "Shimonasaki," kiuj estas fortege fortikigitaj. Nune, ni estas en la interlanda maro, la fama "Inland Sea" de Japanujo: la arbare-vestitaj montoj, valoj, kaj insuloj estas treege pentrindaj, sed la ŝipo, pasante meze, estas tro malproksima de ambaŭ bordoj por ilin efektive vidi.

"Kobe" ne estas granda haveno laŭ larĝeco, tamen estas tre negocema: konstruaĵoj, kaj stratoj troviĝas en bonega ordo. Japanaj puŝveturiloj, nome "Jinrickshaw" (ĝinrikŝa, aŭ, ŝerce, kvankam litere, "pull-man-car,"), estas komfortaj rimedoj por vojaĝi tra la tiamaĵ krudaj enlandaj vojoj, kaj la "kuli" trenistoj kuras rapide po ĝis eĉ kvardek mejlojn ĉiutage. Aranĝinte pri prezo ĉe la estro, la trenistoj sin tenas honeste kontraŭ kontrakto: ili malmulte manĝas, kaj trinkas nur buŝumetojn da "Saki," speco de rizbiero, ordinare trinkata varme: mi ĝin trovis tre plaĉan kiam bone fabrikita. Mi ofte miras, kial oni ne ĝin enkondukas en Hindujon; estus multe pli saniga ol la nunaj krudaj alkoholaj likvoroj, kiel, "Toddy," kaj "Arrack."

Oni ĉiam uzas tiujn puŝveturilojn por enlandaj ekskursoj; unu por si mem, kaj alia por porti nutraĵojn, pakaĵojn, k.t.p.

Estas iom strange, sed tiuj ĉi trenistoj povas fari kurson pli rapide kun sia veturilo, ol sen ĝi.

Klimato estas tre agrabla. Kompreneble, troviĝas multaj butikoj por vendo de ĉiaspacaj kuriozaĵoj. Manko de sciado de la Japana lingvo estas ja bedaŭrinda, kaj oni sopiras je la divastigado de Esperanto, kiam la graciaj servistinoj ĉe la "Tea-houses" (te-servejoj) rideme oferas nutraĵon.

Multaj vidindaj ekskursoj troviĝas apude: ekzemple, al "Ozaka" la "Birmingham" kaj "Venezia" de Japanujo, kie estas multe da fabrikejoj: ankaŭ la Monerfabrikejo imperia.

Oni devus neniam fari tiajn ekskursojn ne portante sian pasporton, preta por montri kontraŭ postulo de policano, hotelestro, stacidomestro, k.t.p.: alie, oni eble forkondukos vin al ia urbomagistrato por ekzameno.

La Kastelo, kun ĝia milita garnizono kaj armilejo, ne devus esti forgesata. Kelkaj ŝtonoj uzitaj por ĝia konstruaĵo estas mirinde grandaj, malfacile estas figuri kiel oni povis ilin meti en ilian lokon, ĉar ili estas multe pli grandaj ol tiuj en la piramidoj de Egiptujo: tamen, oni parolas pri ankoraŭ pli grandaj en "Korea." La banejoj de "Arima" estas apude, kaj donas okazon por provi vian tuŝgecon pri marŝi, kun "kuli" portanta viajn necesojn, pakitajn en Japanaj korboj. Tie la du seksoj kune banas, kaj tre modeste: strange estas, kontraŭ Eŭropa sperto, ke ĉie nudaj popoloj estas pli modestaj ol tiuj vestitaj: tio estas mia propra sperto en Hindujo, ĉe la insuloj de "Andamans": kaj mi vidas ke Sir Charles Eliot simile rimarkas rilate la enlandaj loĝantoj de Orientafriko, en sia ĵus-eldonita verko.

Li ankaŭ skribas pri la lingvo "Swahili," kiu tie estas la Esperanto inter la enlandaj gentoj, kiel "Hindustani" inter tiuj de Hindujo.

La banoj mem estas tre delogantaj por la ruĝkotecoj de la varma akvo: tamen, multe da Japanoj tie kunvenas.

Sendube, kiel multe da aliaj malagrablaj aferoj, ili estas bonaj por la sano.

La vojirado de "Kobe" al la haveno de "Yokohama" daŭras dudekkvar horojn: oni povas ankaŭ tien iri per fervojo. Dum preskaŭ la tuta daŭro laŭ la marbordo, oni rigardas la sanktan monton de "Fuji" (*yama* signifas monto: Fujiyama).

Tie ĉi ni lasis la vaporŝipon, ĝis reveno tempo.

Hoteloj, Klubo, konstruaĵoj, stratoj, elektralumo, tramvojoj, butikoj, k.t.p., estas ĉiuj



laŭdindaj. Kuriozaĵoj el elefantosto, ĉizita ligno, kuprafundaĵoj, lakaĵoj, porcelano de "Satsuma," "Cloisonne," k.t.p., estas montrataj por vendi ĉe multaj superaj magazenoj, kaj oni povas aĉeti ĉia-specojn da Eŭropaj provizaĵoj kaj vestaĵoj.

Ĉe la publika Vendejo frue matene oni certe devus iri vidi la lokajn specojn da nutraĵoj, ekzemple, fiŝoj, legomoj, k.t.p.: oni tie rimarkas kankrojn de malgrandaj korpoj kaj treege longaj kruroj, fazanojn kun dudekfuta mez-vosta plumo.

Estas multe da vidindaj lokoj apude: la "Daibuts" ĉe "Kamakura," grandega kuprafandaĵo, reprezentanta "Buddha," montranta la saman trankvilan pripensan vizaĝon, kiel tiu Dio ĉe la Birmanaj "Pagodas." Ankoraŭ la temploj de "Hachiman": la insulo de "Enoshima," k.t.p.: kvankam iaj temploj estas treege belaj, kaj multekostaj, eĉ ĝis milionoj da libroj, tamen, ĉiodirite, oni iom lacigaĵas je tia aro de vidaĵoj.

Sed unu, nur videbla ĉiujare je fino de Oktobro, nin allogas: t.e., la vivantaj floraj "tabloj," kiel teatraĵoj, fabrikataj el kreskantaj "Chrysanthemums": per kiuj la koloro de vizaĵoj, kaj vestaĵoj, kaj eĉ la formoj de la aktoroj estas fidele imititaj.

Pasante trans la ponto, super la fosaĵo kiu kuras ĉirkaŭ "Tokio" oni admiras la amason en somero, de rozkolora randitaj "Lotus" floroj (akvolilioj), starantaj el malpalaj grandaj folioj kiuj kovras la supraĵon de la akvo.

Oni devus viziti la novan teatron, enhavante 2,500 personojn, el kiuj plimulto sidigas sur planko en malgrandaj loĝioj: laŭ Eŭropa vidpunkto, la Japanaj teatraĵoj estas tro daŭrigataj, kaj pro tia kaŭzo tre enuigantaj.

La vidinda Muzeo troviĝas en la Parko de "Ueno," kiu estas vere simila al ia Angla Parko.

## DIVERSAJ AVIZOJ.

Sur paĝo 68 de nia nuna Volumo ni presigis "Antaŭ la Rigardo de la Vivo." De tiu ĉi la originalo estis verkita de la fama Rusa verkisto, Maxim Gorky.

\* \* \*

"Ĉielo kaj Tero" estas tre belforma traduko de la poemo de Byron, verkita de D<sup>ro</sup> Noel, la eminenta Esperantisto en Nancy. (54 grandaj paĝoj. Kosto 1 ŝilingo, ricevebla de S<sup>ro</sup> Frecot, 35, rue Stc. Catherine, Nancy, France).

\* \* \*

"Esperanta Fonografo, Alfarado de la Sistemo Pitman," verkita de A. W. Lyndridge, estas 24 paĝa verkito, kosto 1 ŝilingo, de la Aŭtoro, Esperanto House, Southend-on-Sea.

\* \* \*

Tiuj Esperantistoj kiuj interesigas je la diversaj fonografiaj sistemoj ankaŭ plezure legos la "Lernolibro de Esperanta Stenografio" (Unuiga sistemo Stolze-Schrey), verkita de nia agema amiko, Pastro F. Schneeberger. Kosto 1 franko, de la Aŭtoro (Laufen, Svisujo), aŭ de la firmo Hachette, la eldonistoj.

\* \* \*

La "Kurso Tutmonda de la Lingvo Internacia Esperanto," verkita de Emilo Gasse, nia sindona Havra kunbatalanto (elpensinto de la bela internacia signo, k.t.p.), estas valora aldono al nia jam granda lernolibro. Verkita laŭ la Berlitz

sistemo, ĝi estas ne nur por Francaj lernantoj, sed, kiel la titolo montras, por tiuj de la tuta mondo. Kosto 9d., de la firmo Hachette.

\* \* \*

"Matematika Terminaro kaj Krestomatio," verkita de Raoul Bricard, estos utila teknika verko por matematikistoj tutmondaj. Kosto 9d., 60 paĝoj, de la firmo Hachette.

\* \* \*

Ni deziras kore danki la multajn amikojn, kiuj sendis al ni Kongres-fotografajn kaj lokajn gazetojn kun raportoj pri la Kongreso. Neniam antaŭe la afero estas ricevinta tian bonegan reklamadon, kaj ĉiamaj devas esti ĝiaj fruktoj.

\* \* \*

La tria numero de *Tra la Mondo* enhavos pli ol 40 ilustraĵoj, el kiuj dek estas pri la Kongres-vojaĝo al Anglujo. Oni povas ricevi la gazeton ĉe la B.E.A., 13, Arundel Street, Strand. Jara abonpaĝo, 6 frankojn.

\* \* \*

Ni plezure anoncas, ke la venonta eldonado de *Cassell's Popular Educator*, kiu aperos je Sept. 25, enhavos serion da Esperanto lecionoj, verkita de S<sup>roj</sup> G. W. Bullen & E. A. Millidge.

Sendube la akcepto de Esperanto en tiu ĉi revuo, kiel egalulo kune kun la aliaj lingvoj, antikvaj & modernaj lernotaj, multe helpos al la disvastigado de Esperanto en Angle-parolantajn landoj.

## VIRINO LA NEKOMPREENBLA. (Parto II.).

El "De Omnibus," humora verko de Barry Pain.

Tradukis Geo. C. Law, kun afabla permeso de la verkisto, kaj T. Fisher Unwin, la eldonisto.

Mi kutimas je la virinoj kiuj daŭrigas la faradon de demandoj, sed tiu kiu daŭrigas respondi kiam oni ne demandas pri io—mi opinias ke ŝi estas pli malbona.

"Mi volas paroleti kun vi," diris unu el tiu gento al mi, "kiam vi finigis la disdonon de biletoj."

"Vi komencu," diris mi.

"La maniero laŭ kiu la interno de tiuj ĉi omnibusoj estas meblitaj estas tre malsaĝa," ŝi diris.

"Mia koro, dum multaj jaroj rompiĝas pro tio," mi diris.

"Ĉu vi ne komprenas ke ŝtofo kun tia supraĵo kaptas la polvon kaj koton? Mi hontas sidigi sur ĝi."

"Mi mem," mi diris, "mi starigĝas. Mi evitas tion tiamaniere."

"Tio kion oni bezonas en Londona omnibuso," diris ŝi, "estas apartigeblaj kusenoj kun moveblaj kaj laveblaj kovriloj, kaj kun glata kaj polurita supraĵo kiu ne tenas la polvon."

"Se vi rediros tion malrapide mi elskribos ĝin kaj donos ĝin al la estro kiam mi revenos al la omnibusejo, tiun ĉi nokton. Sed ne tre utilas paroli al li. Vi komprenos ke kiam infanoj rompas la kolon en tiu ĉi omnibuso la kompanio devas kompensi; kiel estas nur juste."

"Kiel tio rilatas je la afero?" diris ŝi.

"Tiel maniere," diris mi. "Kiam oni metas infanojn sur glatan supraĵon en saltanta omnibuso, ili malsupren glitas kaj rompas sian kolon sur la planko. Ni provis ĝin kaj ni devis kompensi."

"Vere?" diris ŝi.

"Vi povas veti vian vivon pro ĝi," diris mi. "Poste ni provis nian nuntempan ideon, kiu estanta velura, aŭ iom velurema, tenas la vestaĵojn de infano kiu ne povas gliti. Se oni metas infanon sur unu el tiuj ĉi seĝoj, la sola metodo movi lin estos ke la patrino devos levi lin en suprena direkto. Tiu ĉi metodo estis speciale elpensita por ni."

"Nu, mi ĝis nun ne sciis tion," diris ŝi, kaj mi ankaŭ tiel opiniis.

Nu, eble vi imagos ke tio sufiĉis, sed ne. Tiuj spertaj personinoj scias preskaŭ ĉion, kaj ili ne povas enteni ĝin,—ili devas disdoni kelkon.

"Ĉu vi scias," diris ŝi, "ke mi estas elpensinta planon kiu devas interesi la omnibusistojn? Ĝi

senigas la eblecon malhonestigi, kaj tiel evitas ĉiujn tentojn."

"Jes," diris mi, "ni terure suferas pro tento, sed ne estas malhonestigi."

"Vi intencas diri—ebriigi?"

"Ne," diris mi, "estas mortigi, kune kun la uzo de malbona lingvaĵo."

"Ho! vi ŝercas!" diris ŝi.

"Nu," diris mi, "tia interparolado igas viron ŝercema, ĉu ne!"

Ne, mi ne komprenas la virinojn.

Unu el la temoj de ilia kredo estas, ke io kio okazas sur omnibuso estas la kulpo de la omnibusisto. Virino eniras blankan *Putney* omnibuson kun *Putney* presita ĉie sur ĝi, kaj la omnibusisto preskaŭ eksplodanta kriegante *Putney*. Ŝi pagas la monon, ne demandas, sidadas ĝis la vetura fino, kaj tiam ŝi diras:—"Tiu ĉi ne estas *Kilburn*. Kaj kial vi ne diris ke tiu ĉi ne estas *Kilburn* omnibuso kiam mi eniris?"

Ho, jes, ni estas kutimataj je tio. Kia ajn okazas, ni estas kulpaj. Nu, okaze, poŝo estas rabata sur mia omnibuso, la seĝoj estantaj aranĝitaj tre oportune por poŝrabado. Ne estas ĉiam eviteble. Komprenable mi malfermadamas miajn okulojn, kaj kiam mi opinias ke ia viro estas suspektinda, li ne ricevas ian oportunon sur mia omnibuso. Tamen, la poŝrabistoj estas tiel ruzaj ke okaze estas neeble observi ilin.

Antaŭ ne longe, dum mi estis staranta sur la omnibuso, mi sentis ombrelon tiklantan post mian kolon. Mi turnigis, kaj estis ekscitata virino malsupreniranta kaj ekkrianta, "Haltigu la omnibuson! mia monujo estas ŝtelita!" Nu, mi haltigis la omnibuson. Estis tri viroj sur la omnibuso supraĵo, krom tiu ĉi maljunulino, kaj ŝi kulpigis ĉiun ŝtelinte ŝian monujon.

Tiam ŝi turnigis al mi kaj diris ke estas mia kulpo permesinte poŝrabistojn suriri la omnibuson, kaj ke eble ili pagis min por la permeso, kaj ke eble mi mem estis ŝtelinta ŝian monujon. Policano alproksimiĝis, kaj ŝi demandis lin kial li estis tie se la sinjorinoj perdas monujojn. Li eltiris sian notlibron kaj elskribis ĉion—nombrojn kaj nomojn kaj adresojn, kaj la kolorojn de la ĉevaloj. La Ĉielo scias tion kion li ne elskribis. Post ĉirkaŭ kvin minutoj, ni ree formovis kaj la homamaso malaperis. Ni ne estis veturintaj pli ol 100 jardoj kiam tiu benata ombrelo frapis min

denove sur la kolo. "Nu, sinjorino," mi diris, pacience, "kaj kion vi perdis nun?"

"Ho," ŝi diris, "mi estas trovinta mian monujon. Almenaŭ, mi ĵus memoras ke mi ne alportis ĝin tien ĉi, nur la pencojn por la vetura kosto. Kia malsaĝulino mi estas! Sed kial vi ne memoris ke mi ne havis mian monujon kiam mi pagis vin?" Mi ne respondis unu vorte. Mi malestime rigardis ŝin, turnis mian dorson, kraĉis sur la straton, kaj komencis fajfi. Se io instruos viron pri ĝentileco sub enuigaj cirkonstancoj, estas estante omnibusisto.

Okaze, mi utiligas sarkasmon. Mi memoras ke mi tiel agis kun unu el tiuj dimanĉaj fraŭlinoj. La maniero en kiu fraŭlinoj vestigas nuntempe estas nekomprenbla je mi. Ekzemple, ordinara fraŭlino kiu perlaboras po 10 libroj kun manĝadoj ĉiujare. Rigardu ŝin dum ŝia libera dimanĉo kiam ŝi estas eniranta omnibuson ĉe la *Marble Arch*. Ho, estas mirindege! Pri vestaĵoj kaj stilo ŝi kaŭzus la Imperiestraron de Ĥinujo malesperi kaj forlasi la vestigarton. Nu, mi ne intermetas min en aliaj viraj aferoj. Kiam 'Ankin venas al mi kaj demandas ĉu la arbitra konduto de la Regnestraro ne bologas mian sangon, mi diras al li—ne—, ĉar mi opinias ke mia sango nek estas afero de la Regnestraro, nek la Regnestraro afero de mia sango. Kiel mi diris, mi ne intermetas min, kaj se ordinara fraŭlino preferas vesti sin per la tuta mono kiun ŝi povas prunte preni, ne estas mia afero, kaj mi esperas ke tio estas plezuro al ŝi. Sed la fiereco de tia gento mi ne povas ŝati, kaj mi vidas ke fraŭlinoj kiuj kondukas sin ordinare, tuj kiam ili orname vestigas, fariĝas fieraj. Kia estas la kaŭzo? Mi scias tion kio mi estas kaj mi scias tion kio ili estas. Ili povas vestiĝi ĝis ilia vizaĝo nigriĝas, kaj ili ne trompas min. Tial ĉu estas eble ke mi permesos tian genton marŝi super mi? Certe ne.

Ian dimanĉan nokton unu el tiu ĉi gento altiris la omnibuson. Ni pli malrapidigis, kaj eble estis movantaj po unu colo hore. Sed tio ne kontentigis ŝin, kvankam ŝi povis eniri tiel facile kiel kisi vian manon, kaj tie mi estis staranta kun mia brako etendata preta entiri ŝin por ke ŝi ne difektiĝu. Ho, ne! Ne estis sufiĉe bone por ŝia fraŭlina moŝto.

"Kiam vi haltigos la omnibuson," ŝi diris, "mi eniros, kaj ne antaŭe."

Humile kaj pacience mi haltigis la omnibuson, kaj ŝi eniris. Ŝi sidigis kaj elmontris sian pencon. "Jen, prenu ĝin," ŝi diris.

"Dankon, fraŭlino, mi prenos ĝin kiam mi kolektas la monpagojn, kaj ne antaŭe,"—tiel maniere ĥoanta ŝiajn vortojn en ruza maniero.

Tiel, por pli enuigi min, ŝi diris, "Tiu ĉi omnibuso iras malrapide. Ĉu vi ne bonvolas

supreniri kaj peti la veturigiston plirapidigi la ĉevalojn?"

"Ne," mi diris, "mi ne bonvolas. Sed se vi deziras rapidi por remeti la vestaĵojn en komodon, antaŭ ol via mastrino revenos kaj eltrovos ke vi prunte prenis ilin, mi havos plezuron alvokante fiakron."

Ho, ŝi tute ne ŝatis tion, mi sciigas vin. Ŝi povis diri nenion, almenaŭ nenion gravan. Komprenoble, ŝi komencis kalumnii min, sed mi baldaŭ haltigis ŝin. Mi diris al ŝi ke mi neniam permesis tian lingvaĵon en mia omnibuso, kaj mi ne komencus pro ŝi. Ŝi devos aŭ fermi la buŝon aŭ eliri.

Ne, mi ne volis esti malĝentila, kaj mi malamas esti malĝentila. Ne estas trovebla pli trankvila viro ol mi kiam mi estas servata juste. Sed kiam homoj kiuj ne estas pli bonaj ol mi komencas ordoni min, ne estas ia kialo doni plezuro je mia elspezo. Se okazigis ke estas viro mi respondas rekte per lia klara nacia lingvo.

Se estas virino tiam mi provas sarkasmon.

Jen estas alia okazo.

Mi estis promenanta en la strato, preteriranta fruktistejon, kiam subite granda amaso da grajnoj kaj ŝimo (kiu estis orango en siaj pli bonaj kaj feliĉaj tagoj) venis fluganta tra la aero kaj eksplodigis sur mia vizaĝo. Feliĉe mi ne estas kion oni nomas pasia viro. Mi ĵus rigardis en la butikon kaj vidis la virinon kiu ĵetis ĝin. Tiel mi diris sarkasmeme: "Ĉu estas vi, sinjorino, disdonanta viajn senpagajn fruktojn?"

"Ho, la Ĉielo!" ŝi diris, "ĉu vi intencas diri ke ĝi frapis vin?"

"Jes," mi diris, "tia estas la fakto de la okazo."

"Ho, nu," ŝi diris, "mi estis sidanta tie ĉi eltiranta la putrajn, kaj mi vidis neniun preterirantan. Mi intencis ĵeti ĝin en la defuilon. Mi ne celis ĝin al vi; mi estas certa ke ne."

"Ne," diris mi, "mi ne estis via celo. Tio estas la kialo de mia plendo. La plej proksiman tempon, kiam vi estas forĵetanta unu el tiuj ĉi pecegoj da malsana orangaĵo, mi estimos ĝin kiel personan favoron se vi celos ĝin al mi. Tiam vi ne frapos min!" Nu, tio kolerigis ŝin. Ŝi levis unu el la putraj kaj demandis ĉu mi donos aminde al ŝi oportunojn por instrui min pli bone. Pro kuraĝo, mi diris, "Tute bone, ĵetu!" Mi estis staranta en la enirejo, kaj ŝi elĵetis. Ĝi maltrafis min kaj frapis junan policanon starantan ekstere tute en la okulo. Tio donis al mi bonan rikedon. Kaj jen estas alia ekzemplo simila, kie mi sufiĉe suferis por sarkasmigi bovinon.

Mi estas omnibusisto, tio kio mi estas. Ŝajnas simple, ĉu ne? Iel, mi mem ne malfacile komprenas miajn devojn. Mi scias por kio mi estas pagata, kaj mi faras tion.—(*Daurigota*).

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas ĉiajn rajtojn.*

“Ĉe la tablo vi trovos ke via plej proksima najbaro estas treege silentema. Ĉiuj ni estos al vi tre dankaj se pri io ajn vi povos lin interesigi. Sed vi devas komenci la aferon. Se vi ne unue parolos al li, li certe ne parolos al vi.”

“Ĉu estas tiel?” mi respondis. “Nu, mi mem estas silentema.”

Mi vizitis akvosanigejon en unu el la Nordaj partoj de Anglujo. La karakteron de mia tiea tablokunsidanto tiu ĉi fragmento de konversacio sufiĉe montros. Tutan semajnon ni sidis flanko ĉe flanko kaj interŝanĝis ne eĉ unu vorton. Lin mi estis decidinta ataki per lia propra armilo. Mi uzis ununombron ĉar li posedis nur tiun solan armilon de silento. Unu sentencon li fine elŝutis al mi: “Umph! ŝajnas ke ni estas *ambaŭ* silentemaj.”

“Jes,” kaj kontraŭ li mi refalis en unu silenton kiu daŭris ankoraŭ tri tagojn. Eble mi devas diri ke mi “falegis” en silenton, se nur por montri la profundegecon de tiu silento.

Li kapitulacis. Unu tagon kiam ni ĵus estis finontaj la tagmanĝon subite li demandis: “Ĉu vi ludas la ŝakludon, sinjoro?”

“Jes, sinjoro, mi ĝin ludas.”

“Bone! Mi pensis tion; vi tre scias silenti. Se vi konsentos ni ĝin ludos kune.”

Kaj ni faris tion, ludante ne unu solan ludon sed multajn ludojn. Mian iam silentan kunsidanton mi trovis tre lerta, tre informplena kaj tre aminda.

*El pleneĝa karafo oni malfacile elverŝas la akvon.*

Inter tiu aminda silentemulo kaj la Amerika babilulo, kia kontrasto!

Okcidenten rapidas la vagonaro. La Amerikano dum kelka tempo rigardadas al mi. Subite li diras:

“Diru, fremdulo; vi estas *Britisher*, ĉu ne?”

“Pro kio vi pensas tion?”

“Ho, kredeble vi estas la sola viro en tiu ĉi vagonaro, kiu portas flanelan ĉemizon.”

[Memorante la varmegecon de la vetero mi mem miras pri tiu vestaĵo].

“De kie vi venas?”

“Vi diras ke mi estas Anglo; tial kredeble mi venas de Anglujo.”

Anglon tia respondo estus tuj kaj tute silentigita. Ŝajne ĝi nur vekis la sciamon de Amerikano.

“Ho, jes, ĝuste; sed de kie vi nun venas?”

Tia direkta demando ŝajnis al mi neĝentila. Mi memoris la infanan ludon “Direkta demandaro kaj malrektaĵaj respondoj.” Kaj ekkaptis min spirito de kontraŭeco.

“Ĉar la vagonaro iras okcidenten,” mi respondis per voĉo malvarma kiel glacio, “mi supozas ke mi venas de la oriento.”

Mi admiris lian persistecon. Neniel hontigita li senŝancele daŭrigis la demandaron.

“Kien vi iris?”

“Okcidenten.”

“Sed, sed—vi *Britishers* neniam ŝajnas kompreni simplan demandon. Mi intencis demandi, “Al kiu urbo vi nun iras?”

“Jes; mi supozis tion. Ĉu estas multaj interesindaj urboj sur tiu ĉi fervojo?”

“Ho, jes.” Kaj li komencis longan, kaj (mi devas ĝin konfesi) tre interesan priskribon pri sia lando kaj tute forgesis demandi kion mi manĝis je la matenmanĝo.

Poste mi bedaŭris mian rezervemon. Mi rakontis al Amerikano pri la scivolulo. “Ne,” ŝi diris, “li ne estis scivolema. Li estis nur bonkora, kaj vidante ke vi estas fremdulo li deziris helpi al vi. Se vi estus dirinta al li viajn intencojn vi de li estus ricevinta tre utilajn konsilojn. En la ŝtatoj ni havas multajn tiajn personojn.”

Tiam mi hontigis pri mia malboneco kontraŭ li. Tamen ne estas ago de saĝulo malŝtopi botelon per tranĉilego. La korktirilo agas iom malpli direkte sed multe pli efike.

Tra la vagono konstante trapasas kolportistoj kiuj vendas la plej diversajn objektojn. Mi jam antaŭe aĉetis libron. Kaj nun, kiam sur tiun malmolan benkon mi vane serĉas lokon sur kiun mi povos restigi la kapon, mi vidas vendiston de kapsubportiloj. Al li mi signalas, kaj sur la postan parton de la benko li surfiksas ilon kiu laŭ formo similas al treege malgrandigita dormĉambra spegulo. Al si per aksoj alfiksis kvazaŭ duonkadro entenas la iom kurbitan subportilon sur kiun, restiginte la kapon, mi sentas tiel kiel se mi ĝin metis sur la kusenon de luksa seĝego.

Nun la kondukisto eniras por ekzameni la biletojn, kaj tie ĉi mi diros parenteze ke Amerikano ofte aĉetas duone uzitan biletan. Ni supozu ke vojaĝanto aĉetas de la fervoja kompanio biletan rajtigantan veturi de A ĝis C, sed, pro ia kaŭzo li ĉesigas sian vojaĝon ĉe B. Ĉu li, pro tio, devas

perdi sian *rajton* daŭrigi la vojaĝon de B ĝis C ?  
Neniel!

Li vendas la bileton (kompreneble ĉe tre malkara prezo) al (ni diru), la plej proksima tabakvendisto, kiu siavice faras sian profiton vendante ĝin al iu vojaĝanta ĝis C. Tiamaniere aĉetante bileton Amerikano ofte vojaĝas tre malkare. Mi citas tabakvendiston kiel ebla aĉetinto, ĉar ofte mi vidis anoncojn pri duonenzitaj biletoj en la fenestroj de tabakvendejoj, sed kredeble ili ne estas la solaj personoj kiuj aĉetas kaj vendas tiajn biletojn.

Eble la sekvanta rakonteto lumigos sur tiun kutimon. Ĉar la onklino kaj mi mem ofte interrompis la vojaĝadon por vidi la diversajn urbojn kiuj troviĝas sur la vojo, mi komencis timi ke ni atingus la templimon de niaj biletoj antaŭ ol atingi la finon de nia vojaĝo.

Mi, tial, iris al la stacidomo kaj trovinte bilettiston montris al li la biletojn kaj demandis: "Ĉu vi bonvolos diri al mi ĝis kiam mi povos uzi ĉi tiujn biletojn?"

Jen lia respondo: "Nu, fremdulo, mi kalkulas ke vi povos ilin uzi ĉe iu ajn tago dum la venontaj centjaroj."

Mi pensas ke tio plene klarigas la aferon. Biletoj estas (aŭ tiam estis) transporteblaj kaj ne havas templimon.

Laŭ formo la biletoj estas longaj. Tiujn kiujn mi aĉetis estis strioj de papero kiuj tre utilis por montri la pagon en libro. La ekzameno de ili estas afero tre facila, ĉar ĉiu vojaĝanto portas la sian en la bando de sia ĉapelo. La kondukisto ne bezonas demandi la biletojn, sed foje li rektigas unu kiu estas kurbiginta aŭ kies surskribon li ne povas facile legi. Se la vojaĝanto estas metinta sian ĉapelon sur la retbreton li nur montras sur ĝin per la fingro, sed plej ofte la kondukisto ne bezonas tiun montron. Ŝajnas al mi ke li scias al kiu apartenas ĉiu ĉapelo.

Dum kelka tempo la fumo de la lokomotivo

eniras la vagonon, sed la tago estas tiel varmega ke oni ne kuraĝas fermi la fenestrojn. Sur la pagojn de mia libro fummakuloj kolektiĝas pli rapide ol mi povas ilin forbrosi. Ili ankaŭ kolektiĝas sur la palaju vestojn de nigrulo, kiu estas tre bele, eĉ elegante vestita. Subite li sin levas, el iu loko eltiras broseton kaj zorgege sin brosas.

Tiun zorgan brosadon li refaras ĉiu kvarono da horo, ankaŭ donante al si kelkajn intertempajn brosetojn, tiel ke, kiam finas la vojaĝo, oni vidas multajn fumenigritajn blankulojn kaj unu belege kaj pure vestitan nigrulon. Sur lia vizaĝo fummakuloj ne vidiĝas.

Mi dubas ĉu en la Sudaj Statoj estus permesite eĉ al tiel eligante vestita nigrulo veturi en tiu sama vagono kun blankuloj. Ĉe unu suda stacidomo mi vidis la avizon: "Salono de atendo por koloritaj virinoj."

*Klang!* Sur la bolilego de ĉiu Amerika lokomotivo troviĝas granda flavkupra sonorilo de kiu ŝnuro eniras en la lokomotivestrestojn: Mi ofte aŭdas tiun sonorilon ĉar se eĉ bovino eraras sur la reĵlojn oni tiras la ŝnuron.

*Klang, klang, klang!* Ni trapasas negrandan urbon. Ĉevalojn, veturilojn, virojn, virinojn, geinfanojn mi vidas, kiujn neniu barilo apartigas de la ega kaj rapida vagonaro.

Kiel en Anglujo tramveturilo trakuras stratojn tiel tie ĉi la vagonaro trakuras ilin. Nur la sonorilo, per laŭtega voĉo, kriegas: *Klang!* Jen la vagonaro! *Klang!* Flanken ĉiuj! *Klang!* Mi rapidas! Mi ne povas halti! Flanken! Flanken! *Klang, klang, klang!*

Mi ne diros ke mia koro estis en la buŝo sed certe mi pli trankvile spiradis kiam ni estis ankoraŭ en kamparo.

Eĉ tiuj ĉi ordinaraĵoj vagonoj enhavas lavejon kaj ujon de glaciigita akvo, k.t.p. En la proksima fragmento mi esperas ion diri pri la *Pulman'a* vagono.

## EL LERMONTOV.

Tradukite de R. Frenkel (Siberia).

Ĉe sanktologeja la pordeg'  
Almozon petis la staranto,  
Senforta kaj de malsateg',  
De la soifo suferanto.

Peceton nur ja da la pan'  
Tremanta kun rigard' li petis,

Kaj ŝtonon iu en la man'  
De la petanto tiu metis!

Petegis tiel ankaŭ mi  
Kun larmoj kaj kun la turmento  
La amon vian—kaj de vi  
Trompita estis mia sento.

## LA PAPO MORTIS.

Alphonse Daudet.—Esperantigis A. Baissac (Constantine).

Mi vivis dum mia infaneco en granda Franca urbo dividita en du partojn de tre obstrukcata, tre movema rivero kiu junfrue naskis en mi emon por la vojaĝoj kaj pasion por la marveturo. Precipe estis surbordangulo apud ponteto St. Vincent kiu neniam mi memoras eĉ hodiaŭ senekscite. Mi revidas la surskribon najlitan pinte de stango: "Cornet: Ŝipoj por lui" kaj la ŝtupareton kiu atingis la akvon, tute glitigan kaj nigritigan de akvumaĵo, la aron da ŝipetoj freŝe pentritaj de helaj koloroj, ordigitaj malsupre de la ŝtupareto, kviete balancigantaj bordo kontraŭ bordo, kvazaŭ malpezigitaj de la beletaj nomoj blanke desegnitaj sur lia posto "La Muŝbirdo," "La Hirundo."

Poste, inter la longaj remiloj ankaŭ tuteblanke pentritaj kiuj sekigis kontraŭ la deklivo, la nomitan patron Cornet kun lia pentrujo, liaj grandaj penikoj, lia vizago tanita, fendetita, sulkitita de mil sulketoj kiel la rivero dum blovas malvarmeta vespera vento. Ho, tiu patro Cornet! Li estis la Satano de mia infaneco, mia dolora pasio, mia peko, mia riproĉo de konscienco. Kiom da krimoj liaj ŝipetoj incitis min por fari! Mi forlasis la lernejon, mi vendis miajn librojn. Kion mi ne estus vendinta por surakvoveturi posttagmezon.

Ĉiuj miaj lernokajeroj funde de la ŝipo, mia jako demetita, mia ĉapelo kapmalantaŭe kaj tra la haroj la bona ventumilbato de la akva venteto, firme mi tiris miajn remilojn sulkgigante la brovojn por tute ŝajni maljunan marlupon.

Dum la tuta tempo kiam mi estis en urbo mi restis meze de la rivero, samspaco de la du bordoj kie la maljuna marlupo povis esti rekonata.

Kia triumfo partopreni al tiu granda movado de barkoj, fosaĵoj, vaporsipmuŝoj kiuj ĉiufanken moviĝis kaj ne tuŝiĝis unuj la aliajn, nur malkunigitaj de mallarĝa ŝaumobanderolo. Tie estis pezaj boatoj kiuj turniĝis por eniri la fluon, kaj tio delokigis multajn aliajn. Subite vaporsipaj radoj batis la akvon apud mi; aŭ dika ombro alvenis min, tio estis la antaŭo de boato ŝargita de pomoj. "Atentu do, muŝido!" ekkriis al mi raŭka voĉo; kaj mi ŝvitis, mi baraktis, implikita en la iro—deiro de tiu rivera vivo kiun la strata vivo trasuperis senĉese, per ĉiuj tiuj pontoj aŭ pontetoj kiuj aperigis omnibusojn en la spegulan akvon sub miaj remiloj. Kaj la fluo tiel forta eĉ la pinto de la pontarkaĵoj, kaj la akvoturniĝoj, la fama truo de la "Morto-kiu-trompas!"

Pensu ke tio ne estis malgranda afero por gvidi sin meze de ĉio tio per deklujaraj brakoj kaj neniu por teni la direktilon.

Kelkafoje, feliĉe, mi renkontis la *ĉenon*. Rapide mi alkröĉiĝis post tiuj longaj ŝiparoj kiujn ĝi posttiris kaj, la remiloj senmovaj, sternitaj kiel flugiloj alte flugante, mi lasis min veturi je tiu silenta rapideco kiu ŝajnis tranĉi la riveron per longaj ŝaumorubandoj kaj malaperigis ĉiuflanke la surbordajn domojn. Antaŭ mi, malproksime, tre malproksime mi aŭdis la unutonajn batojn de la ŝipsraŭbego; hundo kiu bojas sur unu el la ŝipoj kie forflugas el malalta kamentubo, iom da fumo, kaj ĉio kredigis al mi kvazaŭ grandan vojaĝon kun la mara ŝipivado.

Bedaŭrinde tiuj renkontoj maloftaj estis. Plej ofte estis necese ke mi remu kaj remu dum la sunaj horoj. Ho tiuj tagmezoj kun la suno alfalante rekte sur la riveron; ŝajnas al mi ankoraŭ ke ili min bruligas. Ĉio flamis, ĉio rebrilis. En tiu atmosfero blindiganta kaj suna kiu flosas super la ondoj kaj vibras je ĉiuj iliaj movoj, la mallongaj subakvigoj de miaj remiloj, la ŝnuraĵo de la ŝiptiristoj eltiritaj el akvo tute disfluantaj, pasigis helajn polurargentajn lumojn. Kaj mi remis fermante la okulojn. Iafoje pro miaj energiaj penadoj, pro la antaŭensalto de la akvo sub mia barko, mi imagis ke rapidege antaŭen mi iris; sed levante la kapon, ĉiam mi vidis la saman arbon, la saman muron kontraŭ mi.

Fine post multaj fortuzoj, tute ŝvita kaj ruĝa pro varmeco mi sukcesis foriri el la urbo.

La bruego de la malvarmaj banejoj, lavŝipejoj, enŝipigejoj malpligrandigis. La pontoj maloftiĝis sur la bordoj pilargigitaj. Kelkajn posturbajn ĝardenojn, fabrikejajn kamentubejojn nur oni vidis de tempo al tempo. Sur la horizonto verdaj insuloj ŝajnis tremi. Tiam konsumita de lacigo, mi rifugiĝis apud la bordo, meze de la kankreskajoj tute zumaj, kaj tie, duonesveniginta de la suno, la laceco, tiu multepeza varmeco kiu supreniris el akvo stelumita de larĝaj flavaj floroj, la maljuna marlupo eksangadis el la nazo kaj longe tio daŭris. Neniam miaj vojaĝoj havis alian finiĝon. Sed kion vi volas! mi trovis ilin ĉarmegaj.

Io terura estis la realveno, la reeniro. Kvankam mi revenis per rapidegaj remilbatoj mi alvenis ĉiam tro malfrue, post la eliro el lernejoj. La impresoj de la tago krepuskiĝanta, la unuaj flamingoj en la nebulo, la militaj trumpetaj sonoj por reeniri en soldatejojn, ĉio pligrandigis miajn timojn, miajn bedaŭrojn. Mi enviis la homojn kiuj pasis, trankvile reenirante en sian hejmon; kaj mi kuris havante mian kapon pezatan kvazaŭ ĝi estas plena je suno kaj akvo kun konkaj ronkoj

en la oreloj, kaj jam sur mia vizaĝo la ruĝigo pro mensogo kiun mi tuj diros.

Ĉar tio estis necesa por ĉiufoje respondi al tiu terura "El kie vi venas?" kiu atendis min ĉe la pordo. Estis tiu demando, tuj je mia apero, kiu plej min timigis. Mi devis respondi tie, sur la sojlo, ne atendante, ĉiam havi ian historion pretan, ion por diri, kaj tiel mirigan, tiel mirigegan ke, pro surprizo oni forgesu demandi aliaĵojn.

Tio al mi donis tempon por eniri, retrovi spiradon, kaj por tiun celon atingi, ĉion mi estus farinta. Mi elpensis malfeliĉegojn, revoluciojn, terurajn fariĝojn; tuta urba kvartalo kiu brulas, la fervoja ponto elfalinte en la riveron . . . Sed jen tio kion plej forte mi trovis.

Tiun ĉi vesperon mi alvenis tre malfrue. Mia patrino kiu min atendis de unu longa horo, staris supre de la ŝtuparo. "El kie vi venas," ŝi ekkriis.

Diru al mi kiaj diabloj povas naskiĝi en infana kapo. Nenion mi trovis, nenion mi preparis; tro rapide mi estis alveninta. Subite min alvenis ideo freneza. Mi sciis ke la kara virino estis tre pia, katolikino enradikita kiel Romanino kaj mi respondis al ŝi, spiregante kvazaŭ pro granda eksciteco: "Ho patrineto . . . se vi sciis! . . ." "Kion do? . . . Kio okazas ankoraŭ? . . ." "La Papo mortis." "La Papo mortis! . . ." rediris la kompatinda patrino, kaj tre pala ŝi apogis sin kontraŭ la muro. Rapide mi alpaŝis en mian ĉambron, iom timigita de mia sukceso kaj la grandegeco de mia mensogo, tamen mi maltimis subteni ĝin ĝis fino.

Mi memoras vesperon funebran kaj kvietan, la patro kun malĝoja seriozezo, la patrino premegita. . . . Mallatute oni parolis ĉirkaŭ la tablo. Mi mallevis la okulojn, sed mia aventuro estis tiel forgesita pro la ĝenerala ĉagrenego ke iu ne pensis plu pri ĝi.

Ĉiu, vice, citis ian virtagon de tiu kompatinda Pio IX<sup>a</sup>; kaj iom post iom la interparolado perdis en la historio de la Papoj. Mia onklino Rozo parolis pri Pio VII<sup>a</sup> kiun ŝi tre memoris esti vidinta, trairante la Sudfrancujo en tiama veturilo inter ĝendarmaro. Oni memorigis la faman scenon kun la Franca Imperiestro: "*Komediante!* . . . *traĝedianta!* . . ."

Eble estis la centa fojo kiam oni rakontis tiun teruran scenon; ĉiam per la samaj tonajoj, la samaj gestoj, kaj tiu neŝangebleco de familiaj tradicioj kiuj, alprenitaj de la posteularo tiaj kiajn ĝi aŭdis ilin, restas tie, infanaj kaj lokaj kiel monaĥaj historioj.

Malgraŭ ĉio, iam ĝi ne ŝajnis al mi tiel interesa.

Mi ĝin aŭskultis kun hipokritaj ekĝemoj, demandoj, ŝajno de malvera intereso, kaj konstante mi diris al mi: "Morgaŭ matene, sciigante ke la Papo ne mortis, ili estos tiel kontentaj ke iu ne kuragos min riproĉi."

Tion pensante, malgraŭ mi, miaj okuloj fermiĝis kaj mi vidis, duondorme, blukolorajn ŝipetojn kun angulo de Saonorivero varmegigita de la suno, kaj grandajn akvaraneajn piedegojn ĉien kurantajn kaj sulkigantajn la vitran akvon kiel diamantaj pintoj.

## LA KVERKO KAJ LA KANO.

Fablo de La Fontaine.—Esperantigita de A. Motteau.

En tago, kverko diris al kaneto:  
 "Vi estus prava pri naturo plendi;  
 Eĉ peza estas por vi reĝoleto.  
 Simpla blovo de ventet'  
 Aŭ sur lag' aŭ sur laget'  
 Malsupren vian kapon povas sendi;  
 Dum mia supro, simil' al Kaŭkazo,  
 Ne nur haltigas la sunradiegojn  
 Sed (se por mi prezentas sin l' okazo)  
 Kontraŭbatalas grandajn la ventegojn.  
 Nordblovado tio ŝajnas al vi,  
 Kion mi apenaŭ sentas blovi.  
 Almenaŭ se vi kreskus sub l' ombraĵo  
 Streĉata de mi sur la najbaraĵo,  
 Ne tiel certe tiam vi suferus:  
 Vento ŝirmilon al vi mi oferus.  
 Sed vi naskiĝas sur malseka bordo  
 Aŭ de river', aŭ de torentmalordo,  
 Al vi maljusta ŝajnas la naturo."

L' arbedo diris:—"Estas ne teruro  
 En mia sorto; nobla kamarado,  
 Bonvolu pri mi de nun zorgi ne tro.  
 Malpli ol por vi estas la ventado  
 Por mi timinda. Vento, mia mastro,  
 Min certe fleksas, sed neniam rompas:  
 Vi baldaŭ vidus ke mi vin ne trompas.  
 Jam ventoj ne kurbigis vian spinon:  
 Atendu ni la finon."  
 Ĵus kiam kano tiel paroladis,  
 Plej terura venta blovo,  
 Kiun naskis norda kavo,  
 El horizontekstremo alflugadis.  
 La kverko staras, la kanet' kurbigis:  
 Ventblovego duobliĝas,  
 Atakas kverkon longe por faligi,  
 Kaj fine povas ĝin elradikigi!  
 Ĝin, kies kapo preskaŭ traŝis nubojn,  
 Dum ĝi piedojn sendis en la tombojn!

## AUTHORITATIVE TEACHING IN ESPERANTO.

Those who teach Esperanto to English-speaking students often find themselves called upon to *explain* certain generally-accepted modes of expression in the international language. There is no doubt that a student is perfectly justified in expecting, and should be encouraged to ask for, a logical explanation and a justification of anything which his teacher tells him is "good Esperanto." The principles and rules which Dr. Zamenhof has given us in the *Fundamento de Esperanto* form the whole of the *essentials of the language*. No one is entitled to call himself an Esperantist until he has carefully studied those few grammatical rules and exercises, and has resolved never wilfully to disobey them. The excellent *Sintakso* of Dr. Paul Fruictier and the widely read *Commentaire* of the Marquis de Beaufront are *aprobilaj* by Dr. Zamenhof, and are now generally accepted as standard works in the Esperanto Language. There are others, of course; but he who *knows* the three books named knows Esperanto well.

But the *Commentaire* is in French, and useful only to those who can read French easily; the *Sintakso* is in Esperanto, and does not treat of Esperanto from an English point of view; and the *Fundamento* is merely "law-giving" and not explanatory. We need a good Commentary very badly in England, for a very large number of our students know too little of French to derive full advantage from the *Commentaire*.

To write and speak Esperanto really well one should have a knowledge of French, or, failing that, should be ever on the alert for the occasional contributions to the magazines of English commentators. Doubtless a time will come when the English student will be as well off as the French one for really reliable and well-written commentaries

and dictionaries; at present he must do the best he can.

No student need suppose, then, that if he comes across some Esperanto construction, even in a book which is *aprobata*, that he is compelled to accept it, if it appear to him to be either illogical, insufficient, or idiomatic. He must study the books mentioned above, and then use his critical judgment. This doctrine is not the writer's own; it emanates from Dr. Zamenhof himself.

The English student may find, for example, the clumsy expression *li rompis al si la kruron*, which means to most foreigners "he broke his leg," but which to the young English student means "he broke to him the leg," and which is, after all, *idiomatic*. No foreign Esperantist could misunderstand *li rompis sian kruron*, and there is no reason whatever why that form of expression should not be good, nay excellent, Esperanto. *It is clear, and it is logical, and the best Esperanto style is that which best fulfils these requirements.* The phrase *kiel eble plej baldaŭ* (or *plej baldaŭ kiel eble*) at first sight looks idiomatic, but is in reality not so. It does require explanation, however.

We are accustomed, in English, to say "as soon as possible" when we mean "the soonest possible." Careful thought will enable anyone to arrive at the slight difference in meaning between the two expressions. In "as soon as possible" we use the same form of words as in an ordinary comparison—e.g., "she is as good as she is beautiful"—but we are speaking of something in the superlative, and not in the comparative, degree all the time. Thus "*tiel baldaŭ kiel eble*" is not bad Esperanto; it means literally "as soon as possible"; but whenever we really mean "the soonest possible" we ought to write "*plej baldaŭ kiel eble.*"

MARTYN WESTCOTT, F.B.E.A.

## VERA RAKONTETO.

DE P. CHALMERS TAYLOR (9929).

Knabeto, kiu havis nur kvin jarojn, estis staranta apud sia patrino, kiu faras pasteĉon. La patrino diris al li: "Zorgu, Perĉjo, ke vi ne petu por iom da tiu ĉi pasteĉo, ĉe la noktomanĝo, ĝi estas sole por la gevizitantoj." "Jes, patrineto mia," respondis la fileto, "mi zorgos."

Je la vespero, la patro revenis de sia oficejo, la gastoj alvenis, kaj ĉiuj sidiĝis por partopreni el la manĝaĵoj kiuj estis pretigitaj por ili. Post la vianĉaĵoj, la pasteĉo aperis, kaj la fileto per avidaj okuloj rigardadis ĝin, sed memorante la matenajn

vortojn de sia patrino, li ne kuraĝiĝis peti por iom. La patro iom post iom disdonis la pasteĉon; fine, turnante sin al sia fileto li diris, "Perĉjo, ĉu mi donos al vi porcion da tiu ĉi pasteĉo?"

La kompatinda filo rigardis, unue la patron, poste la patrinon, nesciante tion, kion li devas diri. La patro ree demandis, "Perĉjo, kial vi ne respondas? Ĉu vi deziras porcion da tiu ĉi pasteĉo?"

Tiam la fileto ekplorante diris, "Se vi plaĉos,—patreto,—patrineto diris,—ke ĝi estas,—sole por la—gevizitantoj!!"



## DIVERSAĴOJ PRI LA ARTOJ.

De Walter Dexter, R.B.A.

Ke la plej granda nombro de niaj nuntempaj konstruaĵoj estas ordinaraj, kaj eĉ vulgaraĵoj, ne estas neigeblo. Pasos multaj jaroj, eble, antaŭ la stratoj en niaj urboj fariĝos tiel pentrindaj kiel la *Chester Vicoj*, aŭ la domoj de la negocistoj, kiuj staras laŭborde de la *Amsterdam* kanaloj. Ĝis tia tempo alvenos, ni devas fari ĉion kion ni povas, por montri al aliaj homoj la belecojn de la konstruaĵoj mezepokaj, kaj de la *Renaskiĝo*, kaj tiel ni helpos fari amason de opinio publika, kiu ne volos permesi ke oni detruu tiujn memorigojn de tempo pli pentrinda ol la nia.

Estus bone, en multe da ekzemploj por la urbkonsilantaroj (konsilata de komitatoj de lokaj historiskribantoj, artistoj, arheologiantoj kaj aliaj kapabluloj) aĉeti la malnovajn konstruaĵojn kiuj staras interne de la urbaj limoj. Ĝis tiaj konstruaĵoj estas la solaj vizitindaĵoj por la tuta mondo, kiujn havas multe da malgrandaj urboj. Kaj, en la venontaj tagoj, "la viro sur la strato" lernos ami la artajn arkitekturaĵojn kiuj estis produktataj de liaj praavoj, kaj ne restos kontenta ĝis lia propra domo ankaŭ estas interesa kaj bela.

\* \* \*

S<sup>o</sup> Harry Quilter diras, en sia ensorĉa verko *Sentencie Artis*:—"Granda lernejo de pentrarto estas nebla en la nuntempo, esceptinte ke ni povos aliigi, *unue*, la spiritaĵojn de la

artistoj, *due*, la spiritaĵojn de la societo, *trie*, esceptinte ke ni povos provizi la popolon kun instinkto kiun ili ne posedas, *kvare*, esceptinte ke ni povos ŝanĝi la kondiĉojn de la moderna vivo."

\* \* \*

Skizanta en la "lando de Nelson" mi estas surprizita je la beleco kaj diverseco de la pejzaĝo apud la marbordo, inter *Hunstanton* kaj *Cromer*. Al multaj homoj *Norfolk* estas sinonima kun plateco, sed ĝia norda bordo estas tute neplata. Inter la impona perpendikulara markrutaĵo de *Hunstanton* kun siaj multkolora tavoloj, kaj la verdvestitaj montetoj de *Cromer* estas vastaj regionoj de sablo, kaj ŝlimaj platoj kuŝantaj je la piedoj de malgrandaj montetoj. Tie ĉi kaj tie estas ĉarmaj malnovaj urbetoj kaj vilaĝoj—memorigoj de la marhavenoj kiuj franĝis la bordon en la estinta tempo.

*Burnham-Thorpe*, la naskiĝloko de nia plej granda admiralo, estas lokata en valo ĉirkaŭ ses mejloj for de la marbordo. La tradicio diras ke ĝi foje estis haveno, kaj loko estas montrata al vizitantoj kie, oni diras, ŝipoj ricevis kaj senŝarĝis siajn ŝarĝojn je la urba bordmarŝejo. Sed, nuntempe, *Burnham-Thorpe* estas vilaĝo kvietaj kaj stranga, kie la kredo en sorĉo tamen daŭrigis, kaj kies loĝantoj nomas la loĝantojn de vilaĝoj apudaj—"alilanduloj!"

## NEĜA SUPRO.

El Leconte de Lisle, *Derniers Poemes* (Le Piton des Neiges).

Verso kvinakcenta, deklinusilaba.

De l' oriento mondon lumo vekas ;  
Je disigantaj fajraj garboj strekas  
L' aeron klaran. Supre, altaĵaro  
Per neĝ' kovrita hele lumas ; maro,  
Malsupre, kuŝas, kvazaŭ kurbiginte,  
Kun la senfina spaco kuniginte.  
Simile ambaŭ ora je rivero,  
Senlime fluas blua en aero.  
Ĉe l' okcidento nebuleg' foriĝas ;  
Argenta stelo kiel larm' ruliĝas  
El la okuloj noktaj elirante,  
Tremetas super akvoĵ pendiĝante.  
L' antikva Supro, reĝo de l' montaro,

Ĉiela gasto, mastro de l' akvaro,  
Krutegajn flankojn alte malkaŝante  
Senmove staras, tempon malŝatante.  
Ĝi silentegas, kiam ektagiĝas :  
Pepantaj birdoj tie ne aŭdiĝas,  
Neniam blovas sur ĝi la ventetoj  
Parfumaj, kiuj flirtas en valetoj,  
Nek murmuradas maro, karesante  
Koralajn rifojn, kvazaŭ revadante.  
Ĝi, nesciante teran la bruadon,  
Nenior nian, homan nek vivadon,  
L' eternan vekon sole rigardadas,  
Je neĝ' vestita Sunon atendadas.

J. PARISOT.

## KAMPARAJ AMUZAĴOJ.

Originale verkita de F. A. Meigh.

Ofte estas enigme je multaj homoj kiel obteni monon por bonfaradaj celoj, sed la vikaro de malgranda Angla vilaĝo elpensis sukcesan metodon antaŭ ne longe. La preĝejo bezonis renovigon, kaj la malgrandaj monaj kolektadoj kiujn oni semajne kolektis ne sufiĉis pagi por la necesaj riparaĵoj. Post multa pensado li decidis organizi teo-mangon kaj sportojn en kampo prunte donita je la okazo de farma mastro, kaj demandi po unu ŝilingo por ĉiu persono kiu eniris.

Anoncoj laŭte estis alsenditaj al la proksimaj vilaĝoj kaj urbetoj, kaj la premioj kiujn oni oferis al la gajnintoj de la sportoj altiris grandan amason da homoj.

Frue je la nomita tago kelkaj virinoj sin okupis tranĉi kukojn kaj buteritan panon, ĝis ŝajnis ke ili havis sufiĉan nutraĵon kontraŭstari dekdu-monatan sieĝon. Sed kelkaj el la gastoj ŝajnis posedi nesatigeblan apetiton kaj peceto post peceto da kuko malaperiĝis kvazaŭ magie; dum la tasoj da teo estis trinkataj ne malpli rapide.

Iu rimarkis ke eble kelkaj el la viroj ne estis matenmangintaj, sed alia voĉo ridinde respondis "Ne! kaj mi pensas ke ili ankaŭ ne bezonas matenmangon morgaŭ."

Ĉiu estis tre bonhumora kaj multa gajeco okazis kiam kelkaj malbonemaj junuloj subite duonlevigis la finon de benko sur kiu (ĉe la alia fino) sidis dika farma mastro kaj lia edzino. Tiu ĉi malfeliĉa paro ekrulis teren, kaj ne trovante la epizodon tiel ridinda kiel la ĉirkaŭstarantoj tuj komencis riproĉi unu la alian por la okazo. Suprenrigardante la farma mastro subite ekvidis la vorajn kulpulojn kaj penis ilin kapti, sed lia dikeco malfeliĉe malhelpis lian progreson kaj li baldaŭ revenis ruĝavizaĝa kaj senspira, sed samtempe promesante estontan vengon al la ofendintoj.

Post mallonga tempo la sportoj komencis kaj la mangantoj baldaŭ forlasis la te-tablojn. El la konkuroj por geknaboj inter la aĝoj de dekdu kaj dekkvar jaroj estis la jena.

Oni alligis ŝnuregon al du arboj kaj pendante de ĝi estis fadenoj kun bunoj je la finoj. Tiam geinfanoj kun la manoj kunligitaj malantaŭe staris apude kaj je signalo ili devis komenci mangi la bunojn. Sed tiu ĉi ŝajnis esti malfacila tasko ĉar la malplej movado de la ŝnurego balancigis kaj saltigis la bunojn kaj la infanoj ilin sekvantaj malfermbuŝe ne povis ilin mordi. Anstataŭ, la bunoj frotadis la vizaĝojn kaj surmetis multe da sukero kaj glueco sur la vangoj. Subite unu buno falis teren kaj la konkuranto genufleksante, faris multan progreson mordante kaj englutante pecegojn kiel

malsata hundo. Sed la ridado de la rigardantoj infektiĝis, ĝis eĉ la geknaboj mem apenaŭ povis mangi.

Tamen la knabo kiu mangis genuflekse finiĝis unue sed juĝante per la vizaĝo li ne estis gajninta la premion sen iom da nekonveneco al si mem. Post du-tri kuroj por la malgrandaj geknaboj unu sekvis por la edzinoj (junaj aŭ maljunaj) kiu estis vere amuziga.

Oni desegnigis grandan rondon sur la tero sur kiu staris la edzinoj (blindigitaj bandaĝe per naztukoj). Meze de rondo estis viro, kaj kiuajn marŝis tien kaj lin tuŝis unue estis la gajninto.

Antaŭ ol ekiri ĉiu virino devis sin turniĝi unufoje kaj tiu ĉi tiel konfuzigis kelkajn ke ili vagis ĉie.

Post mallonga tempo la viro estis tuŝita de unu el la edzinoj, tiam alia kaj alia ĝis baldaŭ li ŝajnis kompatindan objekton. Kvin virinoj lin tenis kvazaŭ iliaj vivoj dependis sur la ago. Li estis preskaŭ senvestigita de sia vesto kaj ne povis movi. Ĉiu virino kredante ke ŝi estis la unua alvokis gojege al ŝiaj amikoj.

Sinjoro kiu malatente tro proksime marŝis al tiu ĉi interesa vidaĵo subite ĉirkaŭpreniĝis ĉirkaŭ la kolo de virino kaj malgraŭ la ripetadaj certigoj ke li ne estis la prava viro ŝi daŭris lin teni ĝis per rapida movo li forkuris.

El aliaj eroj sur la programo estis "Barela Kuro."

La bareloj estis tre malgrandaj kaj oni devis ilin ruli 300 futojn per la manoj. Ĉiuj la viroj komencis vice sed la bareloj nemanregiĝis kaj malrekte ruliĝis. Jen ili kune ruliĝis pinĉante multajn fingrojn kaj jen ili ruliĝis kontraŭ la kruroj de viro faligante lin teren. Sed kiam tere, viro ne havis baldaŭ la okazon sin releviĝi ĉar tiuj kiuj estis malantaŭ ankaŭ falis sur lin kaj viroj kaj bareloj tre konfuziĝis.

Post la daŭrigo de tiuj ĉi viglaj okazoj dum kelkaj horoj la dancarto komencis.

Oni ne ofte kreditas homojn je timemo sed mi rimarkis ke kelkaj kamparaj junuloj kune dancis ĉar ili estis tro timemaj por inviti la fraŭlinojn. Ĉiu persono dancis malsimile. Iuj sin turniĝis rapide kiel "teetotum" aliaj sin movis kun la gracio de la minueto. Iuj dancis sur la tero sed multaj ŝajnis paŝi pleje sur la piedfingroj de iliaj kunuloj!!

Ĉiu zorgo forgesiĝis kaj eĉ la maljunuloj penis remontri la facilmoveojn de juneco. Sed ĉio finiĝas kaj antaŭ ol la amaso disiris ili donis tri korajn aplaŭdegojn por la vikaro kiu estis tiom farinta.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

THE INTERNATIONAL  
ESPERANTIST

1905

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- 14 francs: 1½ roubles: 75 centes.

Wholesale Agents: 41, Outer Temple, London, W.C.

All Communications should be sent to THE EDITOR, 67, Edington Gardens Square, London, W.

## CONTENTS.

|  | Page |
|--|------|
| THE COURSE OF 1906 . . . . .   | 161  |
| NOYES ON THE OCEAN, Part V. (by Col.<br>H. K. Gordon) . . . . .                  | 162  |
| A DOUBLE ALMOST (by Clarence<br>Bicknell) . . . . .                              | 163  |
| WISKIN, THE INCOMPREHENSIBLE (trans-<br>lated by U. C. Law), concluded . . . . . | 164  |
| JAMBO (by E. W.) . . . . .   | 165  |
| DECIORNE REMINDOJENES (by Clarence<br>Bicknell) . . . . .                        | 166  |
| THE CAUGHAN, a Poem (translated by<br>A. Nippa) . . . . .                        | 166  |
| OUR LAND, } Poems (by 4000) . . . . .  | 169  |
| LIVE ON, }   |      |
| THE ESPERANTO SYNOPTIC (by<br>R. J. Gray, D. Lit., M. A., F. R. & C.) . . . . .  | 170  |
| HETINA, THE BOWEN (by A. Simon) . . . . .  | 171  |
| REMINDOJENES, Part XI (by E. Matcalf,<br>M. A., D. Litt) . . . . .               | 172  |
| SAVED FROM DEATH, Serial (by General<br>George Cox), concluded . . . . .         | 174  |
| THE CONGRESS COMMITTEE . . . . .   | 176  |
| THE INFERNO OF DANTE (by D. H.<br>Lambert, B. A.) . . . . .                      | 176  |
| ESPERANTO IN THE FUTURE . . . . .  | 177  |

MARQUE DÉPOSÉE.  
No. 1905.

## THE . . . ESPERANTO BLEND.

Registered Trade Mark, No. 210,042.  
Registered Label, No. 278,524.

THE ESPERANTO BLEND is a combination of the finest Whiskies from the Highlands of Scotland, and is of special interest to Esperantists, as the label has been designed to serve as a "propaganda." A liberal CASH DISCOUNT will be allowed to bona-fide Esperantists who comply with the conditions, which can be ascertained on application to the Sole Proprietors—

BUCHANAN, SCOTT & CO.,

Garthland Street, Glasgow,  
Scotland.

Telegraphic Address: "ESPERANTO, GLASGOW."

elveninte el la lernejo paroĥa, estis invitataj eniri dekoje aŭ dekduope en la ĝardenon kaj tie kolekti kaj manĝi la tre sufiĉajn fruktojn. Iliaj kompatindaj malgrandaj kruroj montris multe da cikatroj antaŭ ol ili plendis pri siaj suferoj.

Poste Ĝako ĉiam malliberiĝis matene dum kelkaj horoj; tiu ĉi disciplino tamen ne plibonigis lian karakteron, sed li havis unu meriton, amon fidelan por la mastro, kies reciproka amo savis lin de ekzilo. Ĝakon mi ne ŝatis; al mi la boneco sen inteligenteco estas almenaŭ respektinda, sed spirito lerta unuiginta kun koro malmola min ĉiam repelas; ankaŭ mi tute malamas bekbatojn kaj gratojn tial ke mi neniam min alproksimigis al li. Videble mia evito lin allogis. Kiam ajn mi promenis en la ĝardeno aŭ fruktarbejo li min sekvis. Enfine mia onklino diris: "La birdeto deziras ke vi lin flatu, certe, vi ne ĝin timas." Mi hontis refuzi, mi do min kurbigis, kaj plezure mi vidis la kapplumojn ekvertikaligi kaj la flugilojn ĝoje flirti tiam, kiam mia mano tuŝetas la glatan nigran kapeton.

De tiu momento ni fariĝis amikoj, iom poste li ĝoje saltadis sur mian manon kaj permesis al mi lin altlevi kaj forporti kiam ajn kaj kien ajn mi volis. Mi ĝuis tion ĉar mi malŝatas esti antipatia al ia kreito de Dio, kaj mi pasis kun li multe da belaj horoj. Vere mi ne aprobis liajn morojn, sed mi kredis povi instrui al li la honestecon la bonecon kaj eble eĉ la sindonemon. Unufoje mi diris: "Pensu, kara mia eto pri via vivo estinta, estanta kaj estonta. Vi estis suferanto senhelpa, inter la manoj de knaboj senpensaj, sensentaj. Vi estas iom feliĉa nenion perdinta krom la amo de viaj kunvivantoj kaj la plenuzo de via dekstra flugilo. Vi havas ĉi tie almenaŭ tri amikojn, la geonklojn kaj min. Vi estos ĉiam bone zorgata, en hejmo komforta, gaja, kaj sana. Forlasinte viajn krimetojn, iĝinte bonfarema kaj ĝentila kontraŭ ĉiuj tiel, kiel vi jam estis kontraŭ mi, vi estos tre feliĉa, amata de ĉiuj, kiuj vin konos. Mi do vin petas, estu tiel bona, estiminda kaj honesta kiel vi estas lerta kaj amuziga, por ke vi fariĝu laŭdilo kaj honaro al la gemastroj kaj al mi."

Ĝako ŝajnis kortuŝita per miaj paroloj, sin premante al mia brako kiu ripozis sur ŝtona tablo li rigardis aminde kaj scivole en miajn okulojn. Mi lin kredis pentigintan, mi trompigis. Sed ankaŭ li ne volis min trompigi, ĉar li tute ne estis trompulo, eble pro manko de lingvo universala ni malkomprenis unu la duan.

Apenaŭ mi lin lasis, kiam li suprenrampis sur la tegmenton de la kolombejo kie perfortege frapante li furiozigis la virbirdojn kaj fortimigis iliajn ĝentilajn edzinojn el la nestoj.

Du tagojn post tio, okazis la plej granda malbono el la tuto. Mi sidis en laŭbo, kaj Elfo

belega hundo (kies haroj estis longaj kaj frizaj kaj kies oreloj estis longegaj) min vidis kaj ĝoje kuris al mi! Vidante Ĝakon sur arboreto tre proksima al mia kapo, li metis siajn antaŭpiedojn sur miajn genuojn kaj riproĉe miu rigardis kvazaŭ aminde kaj humile min demandi: "Kiel ajn vi povas kuragi tiun netaŭgulon? Vi scias ja ke li tute estas malbona." Mi respondis, "Nur troe mi tion scias, Karulo, sed ankaŭ mi scias ke ni devas penadi per bonajoj plibonigi la malfeliĉulojn kiuj ne estas ankoraŭ bonaj."

Mi estus plu dirinta sed tiel subite ke mi apenaŭ havis tempon kovri per unu mano la helbrunajn okulojn de Elfo kiam Ĝako jam staris sur lia kapo furioze ĝin batante per beko kaj flugilojn. Mi rapide forpuŝis la birdon kaj eniris kun la hundo en la domon. Mi decidis ke dum tri tagoj mi tute ne parolos al la kulpuleto, sed la duan matenon, sciigante ke li nenion manĝis mi dolĉigis kaj pardonis lin.

Mi restis ankoraŭ duon-monaton ĉe miaj geonkloj; tuttempe estis Ĝako tiel kvieta kaj ĝentila, ke mi kore min gratulis pri lia plibonigo, kredanta ke ĝi daŭros kaj ke mi vidos miajn esperojn tuto plenumigitajn.

## II.

Kompreneble mi ricevis en ĉiu letero sciigon pri Ĝako: dum multaj tagoj post mia foriro li estis tre kvieta sed li fariĝis poste pli ol antaŭe petolema; li eniris mem en apudan ĝardenon kie li treege ofendis neĵunan oficiron kies lakeo rakontis al servisto de mia bo-onklo tion, kion mi nun skribos.

Multaj el la detaloj ŝajnas al mi nekredablaj sed nesciante la veron mi skribas la tuton tiel kiel mi ĝin sciigis. La kolonelo, kiu estis dando kaj tre fiera pro sia grandeco kaj sia mieno, havis nur koroneton da grizharoj, zorge koloritaj brune; la verton de lia kapo kovris peruko bruna. Dum li sidis en laŭbo kune kun tri fraŭlinoj, Ĝako, nevidita malsupreniris el arbo, ekprenis la perukon kaj ĝin bekotenante flirtis longe la ŝtoneta vojeto ne sin permesante kaptiĝi. La kolonelo tiel furiozigis pri la ekspozicio de sia duonsenhareco ke li ordonis al sia lakeo mortigi senprokraste la birdon. Tiu devigis ŝajne obei al sia Estro, sed antaŭ ol serĉi pafilon li diris al ĝardenisto de miaj geonkloj, "Mi petas, diru al lia respektiga Moŝto ke li ne timu pro pafado; mi bone zorgos Ĝakon ne trafi."

Supozeble la lerta friponeto sciis pri la krnela celo de sia milita malamiko kaj faris projekton revengan. Okazo baldaŭ alvenis kaj li ĝin utiligis. Unu postmeztagon la sinjoro eliris rajdante kaj ne revenonte ĝis tiam kiam li sin vestos por granda adiaŭa vespermango al kiu li invitis siajn multajn gekonatojn.

# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens  
Square, London, W.

AUSTRIA.—Sro. T. Cejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Mybs, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Sro. P. Ahlberg, 50, Döbelnsgatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendas se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

25. [Vol. II., No. II.]

NOVEMBRO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 12, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## LETERO DE D<sup>ro</sup> ZAMENHOF AL S<sup>ro</sup> SCHNEEBERGER PRI LA DUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN SVISUJO, 1906.

KARA SINJORO,—Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la Svisaj Esperantistoj decidis inviti la 2an kongreson en Svisujon. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu, ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj Esperantistoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas, ke venos iam la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta Esperantistaro.

Mi persone ne povas nun decidi, ĉar la decidado pri la kongreso apartenas nun al la "Komitato de Organizado" elektita en la unua kongreso; sed mi esperas, ke la komitato nenion havos kontraŭ Svisujo kaj akceptos la inviton de la Svisoj kun plej granda plezuro kaj danko.

Mi esperas, ke la Svisaj Esperantistoj faros ĉion kion ili povas, por bonege prepari la kongreson kaj fari el ĝi imponantan grandiozan manifestacion de interpopola frateco, grandan feston, en kiu krom la Esperantistoj partoprenos ankaŭ miloj da ne-Esperantistoj, kiuj venos kiel gastoj serĉantaj impreson kaj foriros entuziasmigataj kaj Esperantigitaj. Mi esperas, ke la Svisaj Esperantistoj nun ofte kunvenados kaj korespondados inter si, por pretigi ĉion kiel eble plej bone, plej majeste kaj plej frue.

Kompreneble, la Svisaj Esperantistoj devas agadi en plena interkonsento kun la "Provizora Komitato de Organizado." Ili devas ankaŭ peti

konsilojn de S<sup>ro</sup> Michaux, kiu havas jam kelkan sperton.

Ĉar la plej grava celo de niaj kongresoj estas la *propagando*, tial laŭ mia opinio la afero nepre devas esti aranĝita tiamaniere, ke en ĉiuj kunvenoj kaj solenoj krom la Esperantistoj povu partopreni ankaŭ kiel eble plej multe da ne-Esperantistoj (kompreneble ne kiel membroj de nia familio, sed nur kiel *gastoj*, por difinita pago). Por tio oni devus kiel eble plej frutempe veki la intereson de la tuta mondo por nia kongreso per lerte kaj allogge verkitaĵ gazetaj artikoloj, pri kiuj kredeble zorgos la "Provizora Komitato de Organizado." La komitato kompreneble ne devas forgesi dissendi kiel eble plej frutempe inviton al ĉiuj plej gravaj gazetoj de la mondo kaj ripeti tiun inviton (eble kun peto pri definitiva respondo) 6—8 semajnojn antaŭ la kongreso.

Via,

ZAMENHOF.

Varsovio, 2. 10. 05.

N.B.—"Private ni aŭdis, ke D<sup>ro</sup> Zamenhof ne sole venos al la kongreso, sed proponos tie tre gravan aferon, pri kiu li revis en la daŭro de tre multaj jaroj kaj kiu, malgraŭ sia granda graveco elvokos tamen nenian disputadon, ĉar ĝi konsistos nur en la kreado de aparta *sekcio*, al kiu ĉiu Esperantisto povos aliĝi aŭ ne aliĝi laŭ sia propra bontrovo."

## ORIENTAJ MEMORAĴOJ.

Originale verkita de Kolonelo H. K. Gordon.

En Japanujo, oni diras, "Ne parolu la vorton, 'belega,' ne vidinte 'Nikko'n'": kiu ja estas vera!

"Nikko" certe estas paradizo de pejzaĝo Japana: la vilaĝo sidas preskaŭ cent mejlojn de "Tokio," sesdek per vagonaro, kaj dudek per vojo, tra la fama aleo de "*Cryptomeria*" arboj. La propra vilaĝo ja ne estas granda, sed estas la cirkla arego da temploj, antikvaj, multekostaj, kaj speciale sanktaj. Vi rimarkos la ruĝan ponton trans la rivero de "*Daiyagawa*," trans kiu neniu, escepte Lia Moŝto Imperia, havas la rajton pasi.

La bela Lago de "*Chiuzenji*," sidante 4375 futoj da alteco super la marnivelo, kaj ĉirkaŭita de altaj montpintoj da ok—kaj naŭmil futoj, estas atingebla por pied-irantoj. La laga supraĵo estas longa po ok mejloj, kaj larĝa po tri. Salmoj kaj trutoj troviĝas en ĝiaj akvoj, kapteblaj per reto pli ol per hoko. Sur la vojiro, vi pasas la 350-futa akvofalo de "*Kegon-no-Taki*." Apude troviĝas la sanigaj sulfursprucoj de "*Yumoto*."

Tamen, el ĉiuj tiuj lokoj jam vizititaj la plej ŝatita estas "*Miyanoshita*": monteta saniga vilaĝo, atingebla de "*Yokohama*": 31 mejlojn per relo, kaj poste marŝante, aŭ portate supren. Hoteloj bonege mastrumataj per Japanoj estas multaj kaj tre favoritaj de vizitantoj: la kuirado estas laŭ la Franca modo: la aero estas ĝojiga kaj saniga: kaj troviĝas multe da banoj de ambaŭ natura varma kaj malvarma akvo, alkondukataj per bambuaj tuboj de "*Ojigoku*." Ĉirkaŭe troviĝas ekskursoj sufiĉaj por vi dum du semajnoj aŭ eĉ pli. Kiam vi intencas iri iom malproksime, memoru ĉiam kunpreni gvidon: alie, kredeble vi troviĝus danĝere konfuzata, precipe en nevizititaj lokoj.

La ĉefa apuda vidaĵo estas tiu de la bolantaj sulfursprucoj de "*Ojigoku*," vojirante al la Lago de "*Hakone*": oni bezonas paŝi tre singardeme: malmulto estas inter viaj pied-plandoj kaj la bolantaj akvoj malsupre: vaporo ĉie levigas ĉirkaŭe: la vidaĵo do estas stranga kaj vere mistera.

Ĉe la vilaĝo de "*Atami*" malsupre sur marbordo, troviĝas unu "*Gejzir*," simila al tiuj kiuj oni rimarkas en Islando.

De la alta mont-kolo de "*Otome toge*" belegaj vidoj estas troveblaj de la ĉiam mirinda konuso de Fuji.

Longe marŝinte, tre plaĉas reveni Hotelon por varma bano, kaj kviete ripozi antaŭ vespermanĝo.

Printempe, ĉerizarbaroj estas gloraj kun neĝa floraĵo: produktante neniu frukton, la Japanoj ilin kreskigas nur por la plezuro de ilin rigardi. Aŭtune, la folioj de "*Acer*"-arbaroj belege fariĝas flavaj kaj purpuraj kaj karminaj.

Kiel Ĥinoj, la Japanoj uzadas tian sterkon por nutri siajn kampojn kia fariĝas ilin tre malplaĉaj por pasantoj.

La pli malriĉuloj, kiuj ne povas eĉ sin doni ofte la lukson de bano aperas kontraste malpuraj, precipe la infanoj.

La arbaroj estas rimarkinde malplenaj de birdoj kaj bestoj; ni diras "Adiaŭ" al "*Miyanoshita*" tre bedaŭre.

Kioto estas granda loko por artfabrikaĵoj: ĝis kiam oni vidas la klopodon kaj tempon necesajn por fabriki la "*Cloisonné*," k.t.p., oni mankos formigi ideon nek pri modelo de ilia boneco, nek de ilia valoro.

De tie ĉi vi povas viziti la Lagego de "*Biwa*": kaj la traŭro de la akvorapidaĵoj de "*Katsura*" estas spertaĵo rimarkinda; la novaĵo kaj ekscitigo vojaĝante tra oftaj serioj de ŝtonegplenaĵoj kaj bolantaj akvegoj estas memorindaj: la boato estas tre maldikaj, kaj la malplej granda eraro vin pensigas ke vi iras ĝuste al detruigo! tamen malfeliĉoj oni diras estas maloftaj.

La pejzaĝo tra tiuj river-valegoj estas vera kalejdoskopo de natura beleco.

La plej belaj kaj bonevestitaj "Geisha" virinoj troviĝas en Kioto: sed Orientaj dancoj kaj muziko nepre ne estas interesaj por Eŭropanaj okuloj kaj oreloj.

La Japanoj, tiel ni ĉiuj scias, estas grandamantoj de fizika beleco: ĉe vojaĝ kurbigoj kie troviĝas belaj vidoj, vi preskaŭ ĉiam vidos bastonetojn, enmetitajn tere, portantajn paperetojn, sur kiuj estas skribitaj de pasantoj poetaĵoj kaj imagaj versetoj. Ili estas lertaj ĝardenistoj, precipe je miniaturaj ĝardenoj: ili fariĝis adeptoj por malgrandigi arbojn, kaj krei monstraĵojn el la oraj karpfiŝoj: ankaŭ por formigi artan pejzaĝon de ŝtonetaĵoj, akvofaletoj, lagetoj, pontetoj, k.t.p.

Ni mankis rekonti la rimarkindajn antikvajn gentojn, la "*Ainus*."

"Nagasaki" estas nia forira haveno, reirante al Hindujo. La fjordo, ĉe kies supro sidas la urbo, estas bela. Treege bedaŭrinde ni ne plu vidis la "*Pappenberg*" insulon ĉe la horizonto, sciante ke kun ĝi fine velkis de niaj okuloj la plaĉa lando de Japanujo.

Kaj, tiamaniere, kiel diras mallonge Samuel Pepys, hejmen: kaj ree labori ĉe Hindujo.

Generale, la Japanoj estas bonegaj kuiristoj laŭ Franca modelo: sia propra nutraĵo ne konvenas al Eŭropanaj gustoj: oni ne manĝas kun tranĉiloj kaj forkoj, sed kun "lignetoj" kiel Ĥinoj.

Ili estas tre sobraj: tre puraj ĉe siaj domoj: kaj ĉiam atendas ke vizitantoj forprenu siajn ŝuojn enirante la domon. Ne troviĝas meblaro: nek litoj, nek tualettabloj. Fenestroj kaj pordoj estas nur kadroj papere streĉitaj.

Neniam oni koleras, nek blasfemas: sed ĉiam kulturigas ĝentilecon.

Alilandanoj ordinare devas pagi ĉion duoble kaj trioble pli ol patrujanoj.

Anglaj ĉashundoj baldaŭ mortas por internaj vermoj, supozeble trinkinte akvon de rizkampoj.

Nune, Japanoj feliĉe uzadas Romajn literojn

por presi kaj skribi, anstataŭ Ĥinajn: ili ne elparolas la literon "l," kaj Ĥinoj ne elparolas "r": tamen en Korea, oni ambaŭ uzadas.

Japanaj vizaĝoj ĝis nun ne plene montras sekvojn de edukado kaj ĝentileco: sed sendube tiu ĉi rezultos post iom da tempo. Mi mem rimarkis kio povas deveni de prudenta penado tiun direkton: Marton, 1871, mi alestis en Parizo, kaj vidis ducentmilojn da Germanaj soldatoj marŝi sub la "Arc de Triomphe": antaŭ ne longe, mi estis, pasinte 33 jaroj, unu plena generacio, ĉe la Ekspozicio de Düsseldorf, ankaŭ Cologne, k.t.p., kaj tiamaniere havis okazon rimarki la grandan plibonigon je fizika sintenado kaj mieno de la popularo Germana:—laŭdindan celon tre pliigata per la nuna lerta Imperiestro.

Vera enigmo estas, kial nacio, nome tiel aferema kiel la nia, ne povas tion samon efektiviĝi!

## DUOBLA AKROSTIKO.

Verkita de Clarence Bicknell.

MI PER L' UNUA FREMDOLANDOJN VIDAS;  
LA DUA MIN EN HOMAJN KOROJN GVIDAS.

- |  |   |
|--|---|
| 1. AL <i>ĝi</i> virinoj iras ĝoje.     | 1. Kaj <i>ŝi</i> aĉetas ĉiufoje.          |
| 2. <i>Insulo</i> en la norda maro.     | 2. <i>Arbeto</i> de l' insulkampano.      |
| 3. Fumiĝas <i>ĝi</i> en homa buŝo.     | 3. Kaj <i>ĝi</i> per montraŝingrotuŝo.    |
| 4. Tre ofte <i>ili</i> sur la tero.    | 4. <i>Ĝin</i> malbonigas dum somero.      |
| 5. Vi vidas <i>ĝin</i> je tago frosta. | 5. <i>Ĝi</i> estas unu multekosta.        |
| 6. Trinkaĵo <i>ĝi</i> ne higiena.      | 6. Trinkaĵo <i>ĝi</i> la plej venena.     |
| 7. <i>Ĝi</i> portas lumon al la domo.  | 7. Pro <i>ĝi</i> hom' ŝajnas nur fantomo. |
| 8. Se <i>ĝin</i> kunporti vi kuraĝus.  | 8. <i>Vi</i> piedire bonvojaĝus.          |
| 9. Vi vidas <i>ĝin</i> en la preĝejo.  | 9. Kaj aŭdas <i>ĝin</i> ĉe l' operejo.    |

*N.B.*—La unuaj literoj el la vortoj divenotaj alformas enmetitaj la vortojn de la akrostiko.

*La plej bona versigita solvo ricevos premion.*

*Sendu la solvojn al Sro Clarence Bicknell, Bordighera, Italia.*

## VIRINO LA NEKOMPREENBLA. (Parto III.).

El "De Omnibus," humora verko de Barry Pain.

Tradukis Geo. C. Law, kun afabla permeso de la verkisto, kaj T. Fisher Unwin, la eldonisto.

Sed ŝajnas esti kelkaj homoj kiuj pensas ke omnibusisto estas io inter ordinara servistino sensalajra, universala demandejo, kaj senpaga portisto de pakajoj. Jes, mi estas pacienca viro, kaj mi estas tiel volema fari komplezon al iu kiel iu al mi, sed estas limo kie homa naturo haltiĝas, tiel oni diras.

La antaŭhieratnan tagon, mi konatiĝis kun tro multe da tiu gento pri kiu mi aludas; ili venis en amaso. Unue estis maljunulino kiu postulis pinglon kaj demandis ĉu mi povas prunti unu al ŝi. Mi eliris pinglon el mia veŝto kaj donis ĝin al ŝi kun afabla rideto. Poste sinjoro demandis ĉu mi povas diri la korektan horon. Estis du publikaj horloĝoj kontraŭ li, preskaŭ mordantaj lin, sed mi supozas ke estis pli malkare enuigi min ol rigardi ilin. Mi diris al li la horon. Ne estis afabla rideto, sed mi sciigis lin, kaj ne ricevis dankon. Tiam knabo haltigis la omnibuson por demandi ĉu ĝi estas iranta kien li scias ke ĝi ne iras, kaj ĉu mi havas peceton da fadeno. Mi ĵus estis trankviliganta kiam dua maljunulino turmentis min. Tio kion ŝi volis, mi imagas, estis kvieta hora interparolado, kaj ŝi elektis min por la honoro ĉar mi estis la plej oportuna. Ŝi komencis demandante ĉu mi povas diri al ŝi kiom da poŝtmarkoj ŝi devas meti sur ian benitan koverton kiun ŝi tenis en la mano. Tamen, mi estis bonhumora kun ŝi. Sed mi sciis ke la plej posta ricevos esprimon de mia opinio. Tiu ĉi estis junulino. Ŝi estis bela, ŝi estis bone vestita, kaj mi imagis ke ŝi estis pura; sed ŝi estis la speco da malsagulino kiu turmentas miajn nervojn. Ŝi diris kun malsaĝa ekrido, "Ho! ĉu vi povas sciigi min, S<sup>ro</sup> Omnibusisto, se la pelto iam malaperas de viaj ĉevaloj?"

"Mi ne havas ĉevalojn," mi respondis.

"Mi signifas la ĉevalojn de tiu ĉi omnibuso," ŝi diris.

"Ho," diris mi, "ili ne estas miaj; ili apartenas al la Kompanio."

"Kaj ĉu la pelto iam malaperas?"

"Ne," mi diris, "ĉar ili ne havas pelton; ĉevaloj havas haron; de tio la vorto—ĉevalharo."

"Kaj kion vi farus se la haro malaperas?" ŝi demandis.

"Mi farus nenion," mi diris.

"Ne eĉ se ĝi malaperas tre rapide?" diris ŝi.

"Ne," diris mi, "ne eĉ se la ĉevaloj fariĝas tiel senharaj kiel mia mano, ĉar ne estus mia afero."

"Mi bedaŭras sciigi tion," ŝi diris, "ĉar mi volis demandi al vi pri mia katido kiu—." "Sufiĉe, fraŭlino," mi ekdiris, "sufiĉe. Oni imagas ke mi estas fadenujo, kaj poŝtofejo, kaj tualetejo por sinjorinoj, k.t.p., sed mi blindu, se mi estos imagata hospitalo por malsanaj katoj! Ne, estas limo, kaj via piedo estas sur ĝi."

"Ho, vi estas malagrabla!" diris ŝi.

Ĉu ili ne estas mirindaj kreitaĵoj? Kaj kiam okazas oportuno gajni ion, ili povas alteni sin.

Ian tagon, viro donis al mi malgrandan fremdan moneron, havantan la ŝajnon de arĝento, kio ĝi ne estis, kaj ne malsimila je la ordinara sespenco.

Ĝi havis trueton kaj tiu ĉi donis al mi penson. Mi motis najleton tra la trueto, kaj kunigis la moneron al la omnibusa planko. Kaj nun, mi pensis, ni vidos tion kion ni vidos. Unue, maljunulo eniris, ekrigardis la moneron, ĉirkaŭob-servis ŝajne virteme, kaj komencis zumi. Tiam li observis min, sed mi ŝajnis ne vidi lin. Malrapide li movigis sian piedon super la moneron, kaj kurbigis por kunligi sian botfadenon. Mi vidis lin serĉantan tie, klopodantan levi la moneron; tiam li lasis ĝin kaj residigis. Post momento, li eliris.

Antaŭ ol mi finis ridegon, du sinjorinoj eniris. Ambaŭ el ili vidis la moneron kaj tuŝetas unu la alian. Baldaŭ unu el ili kurbigis por levi ĝin. Mi haltigis ŝin. "Pardonu min," mi diris, "sed kion vi faras?"

"Eklevonta sespencon kiun mi faligis iom antaŭe," diris ŝi, tute kurage.

"Pardonu min," diris mi; "ĉu vi estas certa ke tio estas ĝi?"

"Kompreneble, jes," diris ŝi.

"Mi mem vidis ŝin faligantan ĝin," diris la alia sinjorino, "kaj mi vidis ĝin rulantantan tien. Tial ne penu preteksti ke ĝi estas via, S<sup>ro</sup> Omnibusisto."

"Certe ne," diris mi. "Se ĝi estas ŝia, ŝi levu ĝin. Mi nur demandas ĉar mi neniam vidis ŝin faligantan ion."

Tiam ŝi penadis levi ĝin, kaj la komedio komencis.

"Ĝi eble gluiĝas al io," ŝi diris,

"Jes," diris mi, "ĝi estas gluata per najleto tra la mezo. Sendube vi faligis la martelon kaj najleton samtempe kiam vi faligis la sespencon—"



sed se vi observos ĝin, vi vidos ke ĝi ne estas sespenko. Ĉu mi haltigos la omnibuson kaj alportos eltirilon por levi ĝin? Estas domage forlasi ĝin, vi scias." La sinjorinoj spiregis, mi povas diri.

"Nu," diris unu el ili, "mi raportos vin pro insultemeco."

"Raportu min," mi diris.

"Kaj estas la lasta tempo ke ni rajdos en tiu ĉi omnibuso," diris la alia.

"Nu, tio estas grava afero por la Kompanio," diris mi. "Sed, tamen, estas kelkaj personoj en Londono krom vi, kaj mi pensas ke ni povos progresi iel sen via favoro."

Nu, pensu pri tio—du ŝajne respektindaj, bele vestitaj sinjorinoj, kaj ambaŭ el ili mensogantaj kiel soldatoj por po tri pencoj!

Por pasigi la enuigon de ĉiutaga laborado, mi ne pensas ke mi iam trovis ion pli bonan ol la monero najlita al la omnibuso planko. Sed post duonhoro, mi eliris ĝin. Mi pripensis, iom pli da tio kaj mi

ne konfidis al mia patrino du pencojn por alporti al mi bieron sur mia mortlito.

Ian tagon, mi memoras ke dum mi atendis en la "Circus," sinjorino kun hundo volis eniri la omnibuson.

"Ĝi estas tute sendangerema," ŝi diris.

Je tiu momento, ŝia hundo atakis mian kruron.

"Tio estas nur ĝia ludeto," ŝi diris.

"Ne grave, sinjorino," mi rimarkis, piedfrapante la hundon en apudan straton, "same tio ĉi estas mia ĝoja koreco. Kaj mi esperas ke via hundo akceptos tion laŭ la intenco."

Ŝi volis daŭrigi la argumenton, kaj la hundo ankaŭ, sed ni formovis.

La policanoj ne ŝatas la senmovadon.

Sed ne imagu ke mi volas ataki la belan sekson. Tute ne; se virinoj ne ekzistas, ni ne estus tie ĉi. Estas bonaj kaj malbonaj—simile viroj, kaj la sola malsimileco estas ke la virinoj estas malpli facile kompreneblaj. Nature, estas la plej malbonaj kiujn oni plej longe memoras.

## Ĝ A K O .

Verajo, rakontata de E.W.

*La aŭtorino rizervas ĉiajn rajlojn.*

Mi estis ĉe bo-onklo kaj onklino kiuj filigis unu el miaj fratoj kaj amis ĉiujn siajn genevojn. Ni ilin amis, precipe la edzinon, kaj ĉiu el ni pasigis jare kelke da semajnoj en ilia granda gastama domo. Tiu ĉi staris sur la deklivo de iom longa montetaro, ĝia antaŭa parto havis nur du etaĝojn, kies fenestroj rigardis la ĉefvojon kaj la supron de la monteto; ĝia posta flanko havis malsupre trian etaĝon, kaj videgon trans longa bela ĝardeno, sur larĝa fertila platlando. La tuta ĝardeno kuŝis sur la monteto kaj preskaŭ tute estis kampara, ĉar inter ĝi kaj la najbaroj staris muroj kune kun altaj arboj kaj arbetoj; somere ĝi estas tute nevidebla krom el ĝiaj propraj fenestroj.

Niaj geonkloj havis multajn dorlotojn, hundon, katon, katidojn, grandan blankan kokatuon, kolombojn kun iliaj idoj, kanariojn flavajn kaj verdajn, dormuson, sciuron kaj erinacon.

Tiujn ĉi estaĵojn mi konis, kaj pli malpli mi ilin ametis, sed ĵus antaŭ la vizito pri kiu mi skribas, alvenas nova gasto pri kiu oni al mi rakontis nenion bonan. Ĝako estis aĉetita de mia onklino de kruelaj knaboj, kiuj, rompigitaj ĝian flugilon per ŝtonbatoj, lin kaptis.

Ĉe ŝi, Ĝako unue estis malĝoja sed pacema, poste li ja amis la bonfareman mastron, toleris la mastrinon kaj la kuiristinon, kaj neobservis la geser-

vistojn kaj malamis aŭ malestimis ĉiujn aliajn, homojn kaj bestojn.

Estis ja mirinde ke unu sola birdo povu elpensi tiom da rimedoj diversaj por turmenti siajn kunkreitojn. Ĉiumatene li ĉiam staris, kaŝata per folioj, sur branĉo de arbeto apud la flankpordo al kiu la vilaĝanoj alportis korbojn da viando, fiŝoj, kortbirdaro, legumoj, butero, kremfromaĝoj kaj fruktoj. Tial ke estis en la urbeto nur unu butiketo, oni aĉetis kaj pagis preskaŭ ĉion ĉe tiu ĉi pordo. Malbona afero por la senzorga komercisto, kiu ĉesis rigardi sian korbon! Ĉar en unu minuto ĝia enhavo malgrandiĝis, vundiĝis, dispecigiĝis aŭ kovrigiĝis de koto.

Se veturilo starus antaŭ la pordego, aŭ se rajdanto tie lasus ĉevalon, Ĝako sin trovas bekfrapante la piedojn de la besto, aŭ sur ĝia kapo, akre pikante la internon de ĝiaj molaj oreloj, aŭ eltirante ĝiajn kolharojn. La ĝardenisto ofte plendadis ke la diableto lin sekvis horon post horo, kun la sola celo vidi en kia maniero plej malhelpi lian laboron. Kiam li revenis de sia meztagmango, ofte li trovis elteratajn la bulbojn kiujn li ĵus antaŭe enterigis, kaj la semojn disjetitajn. Li tamen neniam povis tre koleriĝi kontraŭ tiel lerta friponeto.

Ĝako ne pardonis mem al la geinfanoj kiuj,

elveninte el la lernejo paroĥa, estis invitataj eniri dekoje aŭ dekduope en la ĝardenon kaj tie kolekti kaj manĝi la tre sufiĉajn fruktojn. Iliaj kompatindaj malgrandaj kruroj montris multe da cikatroj antaŭ ol ili plendis pri siaj suferoj.

Poste Ĝako ĉiam malliberiĝis matene dum kelkaj horoj; tiu ĉi disciplino tamen ne plibonigis lian karakteron, sed li havis unu meriton, amon fidelan por la mastro, kies reciproka amo savis lin de ekzilo. Ĝakon mi ne ŝatis; al mi la boneco sen inteligenteco estas almenaŭ respektinda, sed spirito lerta unuiginta kun koro malmola min ĉiam repelas; ankaŭ mi tute malamas bekbatojn kaj gratojn tial ke mi neniam min alproksimigis al li. Videble mia evito lin allogis. Kiam ajn mi promenis en la ĝardeno aŭ fruktarbejo li min sekvis. Enfine mia onklino diris: "La birdeto deziras ke vi lin flatu, certe, vi ne ĝin timas." Mi hontis refuzi, mi do min kurbigis, kaj plezure mi vidis la kapplumojn ekvertikaligi kaj la flugilojn ĝoje flirti tiam, kiam mia mano tuŝetas la glatan nigran kapeton.

De tiu momento ni fariĝis amikoj, iom poste li ĝoje saltadis sur mian manon kaj permesis al mi lin altlevi kaj forporti kiam ajn kaj kien ajn mi volis. Mi ĝuis tion ĉar mi malŝatas esti antipatia al ia kreito de Dio, kaj mi pasis kun li multe da belaj horoj. Vere mi ne aprobis liajn morojn, sed mi kredis povi instrui al li la honestecon la bonecon kaj eble eĉ la sindonemon. Unufoje mi diris: "Pensu, kara mia eto pri via vivo estinta, estanta kaj estonta. Vi estis suferanto senhelpa, inter la manoj de knaboj senpensaj, sensentaj. Vi estas iom feliĉa nenion perdinta krom la amo de viaj kunvivantoj kaj la plenuzo de via dekstra flugilo. Vi havas ĉi tie almenaŭ tri amikojn, la geonklojn kaj min. Vi estos ĉiam bone zorgata, en hejmo komforta, gaja, kaj sana. Forlasinte viajn krimetojn, iĝinte bonfarema kaj ĝentila kontraŭ ĉiuj tiel, kiel vi jam estis kontraŭ mi, vi estos tre feliĉa, amata de ĉiuj, kiuj vin konos. Mi do vin petas, estu tiel bona, estiminda kaj honesta kiel vi estas lerta kaj amuziga, por ke vi fariĝu laŭdilo kaj honaro al la gemastroj kaj al mi."

Ĝako ŝajnis kortuŝita per miaj paroloj, sin premante al mia brako kiu ripozis sur ŝtona tablo li rigardis aminde kaj scivole en miajn okulojn. Mi lin kredis pentigintan, mi trompiĝis. Sed ankaŭ li ne volis min trompigi, ĉar li tute ne estis trompulo, eble pro manko de lingvo universala ni malkomprenis unu la duan.

Apenaŭ mi lin lasis, kiam li suprenrampis sur la tegmenton de la kolombejo kie perfortege frapante li furiozigis la virbirdojn kaj fortimigis iliajn ĝentilajn edzinojn el la nestoj.

Du tagojn post tio, okazis la plej granda malbono el la tuto. Mi sidis en laŭbo, kaj Elfio

belega hundo (kies haroj estis longaj kaj frizaj kaj kies oreloj estis longegaj) min vidis kaj ĝoje kuris al mi! Vidante Ĝakon sur arboreto tre proksima al mia kapo, li metis siajn antaŭpiedojn sur miajn genuojn kaj riproĉe min rigardis kvazaŭ aminde kaj humile min demandi: "Kiel ajn vi povas kuraĝigi tiun netaŭgulon? Vi scias ja ke li tute estas malbona." Mi respondis, "Nur troe mi tion scias, Karulo, sed ankaŭ mi scias ke ni devas penadi per bonajoj plibonigi la malfeliĉulojn kiuj ne estas ankoraŭ bonaj."

Mi estus plu dirinta sed tiel subite ke mi apenaŭ havis tempon kovri per unu mano la helbrunajn okulojn de Elfio kiam Ĝako jam staris sur lia kapo furioze ĝin batante per beko kaj flugilojn. Mi rapide forpuŝis la birdon kaj eniris kun la hundo en la domon. Mi decidis ke dum tri tagoj mi tute ne parolos al la kulpuleto, sed la duan matenon, sciigante ke li nenion manĝis mi dolĉiĝis kaj pardonis lin.

Mi restis ankoraŭ duon-monaton ĉe miaj geonkloj; tuttempe estis Ĝako tiel kvieta kaj ĝentila, ke mi kore min gratulis pri lia plibonigo, kredanta ke ĝi daŭros kaj ke mi vidos miajn esperojn tute plenumigitajn.

## II.

Kompreneble mi ricevis en ĉiu letero sciigon pri Ĝako: dum multaj tagoj post mia foriro li estis tre kvieta sed li fariĝis poste pli ol antaŭe petolema; li eniris mem en apudan ĝardenon kie li treege ofendis neĵunan oficiron kies lakeo rakontis al servisto de mia bo-onklo tion, kion mi nun skribos.

Multaj el la detaloj ŝajnas al mi nekredablaj sed nesciante la veron mi skribas la tuton tiel kiel mi ĝin sciigis. La kolonelo, kiu estis dando kaj tre fiera pro sia grandeco kaj sia mieno, havis nur koroneton da grizharoj, zorge koloritaj brune; la verton de lia kapo kovris peruko bruna. Dum li sidis en laŭbo kune kun tri fraŭlinoj, Ĝako, nevidita malsupreniris el arbo, ekprenis la perukon kaj ĝin bekotenante flirtis longe la ŝtoneta vojeto ne sin permesante kaptiĝi. La kolonelo tiel furioziĝis pri la ekspozicio de sia duonsenhareco ke li ordonis al sia lakeo mortigi senprokraste la birdon. Tiu devigiĝis ŝajne obei al sia Estro, sed antaŭ ol serĉi pafilon li diris al ĝardenisto de miaj geonkloj, "Mi petas, diru al lia respektoga Moŝto ke li ne timu pro pafado; mi bone zorgos Ĝakon ne trafi."

Supozeble la lerta friponeto sciis pri la kruela celo de sia milita malamiko kaj faris projekton revengan. Okazo baldaŭ alvenis kaj li ĝin utiligis. Unu postmeztagon la sinjoro eliris rajdante kaj ne revenonte ĝis tiam kiam li sin vestos por granda adiaŭa vespermanĝo al kiu li invitis siajn multajn gekonatojn.

Lia fidata servisto profitis de lia longa foresto por viziti sian duonpatrinon kaj ŝiajn naskitojn, antaŭe pretiginte ĉion, kion bezonos sia estro.

Sur la lito kuŝis neĝblanka ĉemizo kies brusto diafanigis per pasamento, kaj trukudraĵo, paro da travideblaj strumpetoj de blua silko, paro da dancŝuetoj tre delikataj, kaj multekosta vesto brodita de arĝento kaj perloj.

Sur tablo staris ujoj enhavantaj vasojn da pomadoj, pudroj, sapoj kaj kaloroj, por beligi vizaĝharojn kaj haŭton. La servisto estis formovinta la orajn kovrilojn de ĉiuj tiuj ĉi ujoj, de multe da odorboteloj kaj mem de juvelujeto, por ke sia iom malpacienca estro povu preni rapide ĉion, kion li volos. En la vestejo li pretigis la banilon kaj ĉirkaŭ trionon pleniĝis per akvo el kiu li aldonos akvon varmegan tiam kiam ĝi dizirigos. Alfine li eliris, ŝlosis zorge la eksterajn pordojn de la du ĉambrojn, enpoŝis la ŝlosilojn kaj gaje formardu al sia patradometo.

Mizerulo! li sin gardis kontraŭ homa trudo sed tute ne pensis pri birdoj. La dormo ĉambro havis tri fenestrojn, el kiuj unu estas malferma; ekster ĝi kreskis branĉetoj de arbo kies aliaj branĉetoj tuŝis al la vestibla fenestro de la dua etaĝo. Ĝako eble supreniris la ŝtuparon, eliris tra unu fenestro kaj enirinte tra la dua sin trovis en la litĉambro de la kolonelo. Certe estas ke oni lin vidis mal-supreniri per la ŝtuparo kiam li forlasis la domon.

Reveninte post du horoj kaj tri kvaronoj la servisto alportis akvon bolantan por la bano. Gaje fajfante li malŝlosis pordon, subite audigis ekkrio kaj ĝemego. Unue li vidis sur skribtablo renversitan inkujon, kies enhavo estis nigriginta plumujon de elefantoto kaj veluran tablo-kovrilon. Ora ringosigelo kaj du ebonaj plumingoj mankiĝis, sed pli malfrue troviĝis en la banilo, kune kun dancŝuo, vazkovriloj, multe da iloj da ŝtalo utilaj por la sciensa kulturo de okulharoj, brovoj, vangharoj, dentoj kaj ungoj: plie, ĉeno de virinaj haroj kun pendajo de diamantoj en blua ŝtrumpeto multe ŝirita.

Poste sin turninte al lito li vidis la ĉemizbruston tute ĉifitan kaj per inko makulitan. Sur la tualettablo estis la difektaĵo ankoraŭ pli granda; multaj el la odorboteloj renversiĝis kies fluidaĵoj intermiksitaĵ kun pudroj gantekoloraj, malpurigis la muslinon kaj paron da gantoj arĝentegrizaj.

Multe da juveloj, nome, butonoj ringoj, medalionoj riĉege ĉizitaj aŭ emajlitaj, kaj antikvaj moneroj el oro mankis. Tiuj ĉi en la daŭro de kelkaj tagoj troviĝis sub mebloj en diversaj ĉambroj aŭ subŝtuparaj tapiŝoj.

La servisto ne ankoraŭ reordigis la duonon da la objektoj kiam tondris ĉe la pardego la frapo de lia estro. Bonŝance tiu ĉi revenis tiel malfrue ke li ne havis (kiel rakontis la lakeo) eĉ sufiĉe da tempo por blasfemi. Iu diris ke la lakeo ĝuis la mal-

pravaĵon de tiu tago almenaŭ tiom kiom la faranto mem.

Komprenoble Ĝako malliberiĝis ĝis la postmorgaŭa foriro de la kolonelo.

Li tiam estinte liberigita paradadis fiera kiel ia venkinta heroo kaj oni lin rigardis kun admiro preskaŭ egala, ĉar lia kontraŭulo tute ne estis idolo popola. Tempe li vivadis kviete, sed granda ŝanĝo lin estis atendanta.

Laŭ konsilo medicina miaz geonkloj decidis sin transloki en pli varman klimaton, kaj dum jaro vojaĝi. Tial ke ili devis disiĝi de siaj bestoj kaj birdoj. Ĝako donaciĝis al ĝardenistedzino, kies Joĵo, Manjo, Viĵo Sonjo kaj iliaj kvar pli junaj gefratoj lin treege deziris, ilia patro ĉiam estis bonfarema kontraŭ li, kaj ilia dometo staris malproksime de la ĉefvojo kaj de malbonaj knaboj: tial ke ni povus kredi ke nia Ĝako tie estos feliĉa.

### III.

Post proksimume tri jaroj mi trapasis la graflandon, kaj mi haltis tri tagojn ĉe antikvaj amikoj en la urbeto. La duan tagon mi marŝis malsupren en la platlandon por vidi Ĝakon kaj liajn gemastrojn, sed ili ĉiuj forestis. La dometo staris apud arbeto en kiu la birdo ĉiutage restis multajn horojn; kelkfoje en la somero li ne revenis eĉ nokte hejmen. Tie li nun estis.

La infanoj min brue kaj gaje bonvenigis kaj multe al mi rakontis pri la superhoma lerteco kaj amuzigece de mia amiko, ilia birda kunludanto. Ili diris ke li sendube havas edzinon kaj idojn en la arbeto, kaj ili atendas ke tiuj ĉi baldaŭ venos al la dometo, por prezentigi al la familio.

Dum nia parolado pri Ĝako alvenis la patrino, kiu tute certigis tion kion ŝiaj gefiloj al mi rakontis pri lia plibonigo. "Vere estas ke li kelkfoje disŝiras butonojn el kolumoj aŭ manumoj, pendigitaj sur branĉoj por sekigi, foje li enmetas sablerojn aŭ polvojn en la buteron aŭ fruktaĵon, ankaŭ li tro amas tiri harojn kaj tordigi ĉapon aŭ buklojn. Malgraŭ tiuj ĉi esceptetoj," diris la aminda virino, "li estas tiel virta kiel ia Kristano, ĉar ni ĉiuj havas niajn proprajn kulpojn." Tiam Manjo memorigis sian patrinon ke S<sup>o</sup> D., maljuna fraŭlo, volis aĉeti Ĝakon po dekvin ŝilingoj, granda prezo por monedo, kaj poste proponis livron, tamen ŝia patro rifuzis, dirante ke neniam, neniel li vendos la friponeton, eĉ ne po dekoble, ne po centoble la kosto nomita. Ankaŭ ŝia praavo diris ke neniu devas tion vendi kion donace iu ricevis; plie li diris ke la ĉeestado de tia birdo alportas bonŝancon al la hejmo, samtempe asekuranta ĝojan vivadon al ĉiuj la tieaj loĝantoj. Kaj tiel plu, denove, denove, en simpla boneco la honesta familio penadis trankviligi mian koron rilate al la feliĉecon de Ĝako kaj al la alta

estimado por liaj mirindaj virtoj sentita de liaj najbaroj, laboristoj, kaj farma mastroj, la forĝisto la kuracisto, pastro, poŝtisto, policanestro. Ĝale lin amegis la lavistinedzo kaj ĉiuj virinoj en la ĉirkaŭaĵo, sen escepto eĉ de la malgaja, severa lernejestredzino, la teruro de la tuta paroĥo.

Kompreneble mi ne kredis ĉiun vorton el iliaj laŭdegoj, mi aŭskultis tamen plezure, kaj plezurege mi enŝutis en la manetojn de la infanoj la enhavon de mia monujo, donacon de po ok pencoj, kiun ili ĝoje ricevis kaj mi diris "adiaŭ."

Apenaŭ alveninte al fino de la ĝardena plekto-barilo mi subite aŭdis ekkrion, "Ho! fraŭlino! jen estas Ĝako! revenu! revenu!" Mi rigardis, mi vidis mian amikon fiere saltantan de la arbeto al dometo. Mi vidis sed mi ne iris returnen. Mi estis jam malfrua, mi devis rapide marŝi. Se li min vidus, se li min rekonus, vere la redisigo estus por ambaŭ tre doloriga. Se, kontraŭe, li min forgesis.

Neniam mi revidis Ĝakon, nek la ĝardenistan familion.

## MEMORAĴOJ PRI LA BULONJA KONGRESO.

Clarence Bicknell.

Tiun agrablan Dimanĉan posttagmezon, kiam ni ĉiuj iris al la Wimereux ĉevalkuradoj, mi renkontis, apenaŭ alveninte, malnovan amikon, kiun mi ne estis vidinta de multaj jaroj.

Li estis ĉiam viro gaja kaj ŝercema, kaj tuj mi ekvidis ke li estas neniel ŝanĝiginta. "Ho!" mi diris, "kia plezuro rerenkonti vin. Kiam vi alvenis? kial? kun kiu? Eble vi partoprenas je la ĉiusabata Angla ekskurso." "Jes," li respondis, "jes vere, ekskurso, ĉar Vendredon mi finis mian kurson de Esperantaj lecionoj; tial nun mi mem estas eks—kurso."

"Do vi estas Esperantisto," mi ekkriis.

"Kompreneble," li diris, "kiel ĉiuj saĝuloj. Ĉu vi ne vidas mian steleton?"

Sed, la ĉevalkurejo estis kovrata de steletoj, kiel la nokta ĉielo, kaj unu pli malpli ne diferencigis, ĝis tiu momento mi ne rimarkis ĝin.

"Mi kore gratulas vin," mi diris. "Ĉu la ĉevalkuradoj vin interesas?"

"Jes, sufiĉe," li diris, "sed estas tre strange ke la hipodromo kuŝas sur la montetoj."

"Kial?" mi demandis.

"Ĉar mi ĉiam pensis," li respondis, "ke oni neniam konstruis ilin sur la montetoj; vi sciis ke la bestoj kiuj kuras estas ĉiam ĉe-valoj."

"Bone, bone," mi respondis, ridante; "mi memoras ke foje ni kune iris al Angla kurado, ne vere?"

"Certe," li respondis, "kaj ĉevalo falis kaj sia kruro rompiĝis, aŭ, kiel niaj Francaj amikoj diras, iom idiome, *li rompis al si la kruron*."

"Jes," mi diris, "mizera besto; *almenaŭ li mem ne rompis sian kruron* kiel diras, iomete idiomege niaj Anglaj amikoj, la malfeliĉo okazis pro nezorgo de la rajdanto. Sed li ne povis partopreni poste ĉe la ĉevalkuradoj."

"Necese," mia amiko respondis, "ĉar li ne estis plu ĉevalo."

"Mi ne komprenas," mi diris, "ne plu ĉevalo, kial? Li estis ĉevalo, kvankam lama."

"Precise," li diris, "la ĉevalo kun rompiĝinta kruro farigas la-mulo, kaj mulo ne estas ĉevalo."

"Sufiĉe, sufiĉe," mi ekkriis, "vi mem estas ĉiam serĉe-mulo! sed nun adiaŭ. Ni nin revidos vespere, aŭ kredeble morgaŭ ĉe la balo."

"Jes, ĉe la balo," li diris, "sed vi ne serĉu min sur la planko de la salono! Mi estos supre en la balkono. Ni ne iros por danci sed por trovi konatojn, aŭ konatiĝi kun nekonataj Esperantistoj; pro tio ni elektos la balkonon! Adiaŭ ĝis morgaŭ."

Kaj ni disiĝis.

## KAŬKAZO.

El Puŝkin.—Tradukita de A. Nippa (Ivanino).

Sub mi la Kaŭkazo. Mi sola staradas  
Sur neĝoj ĉe rando de la profundaĵo:

La aglo, fluganta de ŝtona altaĵo,  
Proksime de mi en aero nagadas.

De tie mi vidas de fluoj naskigon,  
Unuan de neĝaj lavangoj moviĝon.

Malsupre la nuboj, humile irantaj;

Tra ili faladas la fontoj bruegaj,

Sub ili la nudaj ŝtonegoj grandegaj;

Pli sube la musko, arbaĵoj rampantaj,

Kaj poste la verdaj ombrplenaj arbaroj  
Kun cervoj saltantaj, pepanta birdaro.

Kaj poste jam homoj en montoj nestiĝas,

Kaj ŝafoj sur montaj deklivoj rampadas,

Kaj valon paŝtistoj malsupreniradas,

Rapida rivero Aragvo vidigiĝas;

Rajlanton malriĉan per ŝtonoj kaŝanta

Kaj teren ludadas bruege ĝojanta.

Ĝi ludas kaj bruas, la besto kaptata,

La manĝon el kaĝo el fero vidanta,

En vana malamo la bordon batanta,

Lekanta ŝtonegojn per ondo malsata.

Sed vane! nek manĝon, nek ĝojon havadas

Senvorte ĝin mutaj granduloj premadas.

## HO! LANDO NIA.

Originale verkita de Esperantisto 4686.

Nur unu sola lando estas  
De paco, de frateco  
En kiu la frataro ĝojas  
Pro lingva unueco ;  
En kiun ĉiuj povas veni  
Sen ia ajn demando  
Pri raso, kredo, opinioj—  
La Esperanto-lando.

*Ĥoro.* Ho lando via, mia, nia,  
Ho tutamonda lando.  
Ni kore, ĝoje vin salutas,  
Ho Esperanto-lando !

Ne por si mem, por famo sia  
La anoj klopodadas.  
Por cel' pli glora, nobla, ili  
Senĉese laboradas.  
Por paco, ĝojo en la mondo  
Por amo al homaro  
Pripensas, penas kaj suferas  
La Esperantistaro.

*Ĥoro.* Ho lando via, mia, nia,  
Ho lando de l' frataro.  
Ni vin salutas, kore, ĝoje  
Ni, l' Esperantistaro.

Do al ni venu ĉiuj homoj  
El ĉiu eksterlando  
Kunigi vi kurage, saĝe,  
Kun nia frata bando.  
Jen nun foliojn, florojn portas  
La branĉoj de l' fruktujo,  
La frukt-rikolto vin atendas  
En Esperantistujo.

*Ĥoro.* Ho! lando via, mia, nia,  
De l' paca olivujo.  
Ni vin salutas kore, ĝoje,  
Ho, Esperantistujo !

## HO, VIVADU!

Originale verkita de Esperantisto 4686.

Vivu, vivu, Esperanto !  
Kara lingvo nia,  
Kunligilo por homaro  
Lingv' internacia.  
Kaj vivadu l' Espensinto  
Zamenhof Doktoro,  
Al li donu ĉiuj homoj  
Dankojn kaj honoro.

*Ĥoro.* Do vivadu l' Elpensinto  
Zamenhof Doktoro,  
Kies nomon li laŭdadu  
Per korega ĥoro.

Oceanoj kaj montaroj  
Ne plu nin disigos  
Unu lingvo, Esperanto,  
Forte nin kunligos.  
Kien ajn ni vojaĝados  
Trovos ni frataron  
Unulingvan familion  
L' Esperantistaron.

*Ĥoro.* Do vivadu, k.t.p.

Ne okazos plu malpacoj  
Pro malkomprenigoj  
Ne plu interklarigistoj  
Estos por sciigoj,  
Ĉiu povos al alia  
Esti bonhelpanto,  
Ĉiuj interparolados  
Meze Esperanto.

*Ĥoro.* Do vivadu, k.t.p.

Do gefratoj, laboradu  
Por la celo glora,  
Per senlaca pacienco  
Kaj kura' fervora.  
Vi la tagon de la venko  
Tiel rapidigos  
Kaj la tutan mondon baldaŭ  
Esperantistigos.

*Ĥoro.* Do vivadu, k.t.p.

## LIMERICK.

Estis iatempе fraŭlino  
Troе bongustamulino ;  
Per spicaj manĝaĵoj  
Kaj multaj frandaĵoj,  
Ŝi iĝis internpeklitino.

G. D. LEWIS.

## LA ESPERANTA SUBJUNKTIVO.

Verkita de R. J. Lloyd, D.Lit., M.A., F.R.S.E.

La plej timeginda malamiko de nia kara lingvo estas la lingva herezo, t.e., la propagando de falsaj kredoj pri la gramatiko. La plej danĝera el tiuj ĉi falsaj kredoj estas hodiaŭ la neo de la ekzistado de Subjunktiva modo en Esperanto. La granda miraĵo tamen estas, ke en Esperanto, ĝuste tiom kiom en aliaj subjektoj, la herezo elvenas ĝuste el tiuj samaj personoj, kiuj sin rigardas kiel la plej fidelaj sekvantoj de la sankta kaŭzo.

Mi unue vidis tiun ĉi herezon en la paragrafo 218 de la Sintakso de tiu energiega Esperantisto, Doktoro Fruictier: kaj mi reĵetis ĝin tuj. Sed mi silentis: ĉar mi sciis bone ke Sinjoro de Beaufront diris ĝuste la kontraŭon, kaj diris ĝin tiel klare kaj konvinkante, ke neniu, kiu scias vere kio Subjunktivo estas, povas ĝin disputi. Tial mi ne sentis iun timon pro la kara lingvo, kaj silentis.

Sed nun ankoraŭ oni predikas fervore la manko de Subjunktivo, kaj predikas ĝin kiel senca artikolo de la vera Esperanta kredo. Unue mi volis lasi la tutan aferon al la Centra Lingva Komitato, kaj intertempe ankoraŭ silenti. Sed la herezuloj ne silentas, kaj la komitato ne komencas ankoraŭ verki. Mi skribas tial kun duobla celo, respondi al la herezuloj, kaj elvoki baldaŭnan decidon de la Centra Komitato.

La argumentoj per kiuj oni penas pravigi tiun ĉi opinion estas tiel infanaj, ke mi preskaŭ hontas ilin rakonti. Mi tial nur signalas la unu el ili, kiun mi trovas la plej bona. Se tiu ĉi falos, la aliaj nepre falos ankaŭ. Oni diras simple ke nia glora Majstro neniam uzas la vorton Subjunktivo, kaj tial Subjunktivo ne ekzistas! Le bela, la belega argumento!

Kion taŭgas la neuzadon de la nomon, se li uzas ofte la modon mem? Kaj la fakto, ke li uzas subjunktivan modon, estas simple neneigebla. Mi donas malsupre dek frazojn, tiritajn el la du fundamentaj verkoj de la Majstro, el kiuj ĉiu unu enhavas nedubeblan Subjunktivon. Jen!

*Krestomatia.*

P. 33. Kajli malkovris la manon, ke la serpento tie mordu.

P. 221. La poŝto sendas specigistojn, por ke ili la leterojn specigu.

P. 88. Ŝi bezonis eniri du fojojn la ĉambron, por ke oni povu ŝin rimarki.

P. 89. La majstro zorgu ke neniu el la tri personoj malaperu el la domo.

P. 50. Metu viajn manojn en la liajn, tiel ke vi fariĝu edzo kaj edzino.

P. 53. Li lasis fari al ŝi viran vestaĵon, por ke ŝi povu akompanadi lin.

P. 291. Uzi jaron por tio, ke ili povu regule skribi en sia patra lingvo.

P. 309. Penante pli zorge, ke ĝi ne kontraŭagadu.

*Fundamento.*

P. 15. Subtenanta la kruĉon, por ke la virino povu trinki.

P. 19. Estus tre bele, ke mi iru al la fonto.

Neniu, kiu scias kio Subjunktivo estas, povos nei ke tiuj ĉi dek frazoj enhavas dek diversajn Subjunktivojn.

Skribante, mi aŭdas ke tiu ĉi sama batalado okazas nun samtempe in Franclando, kaj mirege, en la paĝoj mem de la bela gazeto de Sinjoro Fruictier, la "Lingvo Internacia." Sed, tiel kiel la Naturo ofte provizas, inter la herboj de la kamparo, la kontraŭvenenan herbon ĉe la flanko de la venena, sammaniere Sinjoro Fruictier provizas por ni, en la paragrafo 163, ekzemplojn, kiuj estas tre bonaj kontraŭvenenoj al paragrafo 218. Jen la ekzemploj:—

Mi deziras, ke li venu.

Estas necese, ke li venu.

Mi petas, ke vi ne faru tion.

Mi timas, ke li venu.

En Esperantaj gramatiklibroj la ekzemploj ofte parolas multe pli bonan gramatikon ol la paragrafo. Mi lasos tial la paragrafon kaj demandas kion tiuj ĉi kvar ekzemploj instruas?

La aŭtoro priskribas la kvar dependajn verbojn, kiel imperativoj! Tute ne: ne estas sola imperativo en la kvar sentencoj. Li donas al ili la ŝajnon de imperativo, uzante kiel ĉefajn verbojn "deziri" kaj "peti." Sed tio estas pura sintrompado: la formoj, kiujn ni diskutas ne estas la ĉefaj verboj, sed la formoj kun *u-fino*; kaj nenio estas pli evidenta ol la fakto, ke ili estas dependaj tempoj, formantaj dependajn frazojn, priskribantajn la objektojn ne nur de "deziri" kaj "peti" sed ankaŭ de "timi," en kiu ne ekzistas la plej malgranda nuanco de ordono aŭ de peto.

Kaj tio estas ankoraŭ pli vera pri la ekzemploj, kiujn mi donis antaŭe, skribitaj de la Majstro. Kolektante ilin, mi evitis zorge verbojn ĉefajn, kiuj enhavis iun signifon de deziro aŭ peto aŭ

ordono. La uzado de tiaj verboj en tia afero estas tute nezorga kaj erariga.

Rigardu la ĉefajn verbojn de la Doktoro,—malkovri, sendi, bezoni, zorgi, meti, uzi, peni: ne estas unu sola el ili, kiu enhavas imperativan ideon: kaj tial la tuta sentenco, kvankam ĝi enhavas la modon nomitan “ordona,” ne esprimas ordonon, nek eĉ peton aŭ deziron.

La Zamenhofaj ekzemploj, kiuj pleje turnas supremalsupren tiun ĉi fantazian teorion, estas la dua, la tria, la sesa, la sepa kaj la naŭa. Ili enhavas ĉiuj la “por-ke” idiomon; kaj la kvina enhavas la “tiel-ke” idiomon. Estus perdo de tempo argumenti pri tio. La bone instruita leganto vidos tuj, ke la lasta enhavas subjunktivon de rezultato, kaj la aliaj, subjunktivojn de celo.

Por konfirmi sin en la vera fido, la plej efektiva ceremonio estas la atenta kaj zorga legado de la argumentoj de paragrafo 218, kiuj penas pruvi ke la “por-ke” konstruo ne estas subjunktiva. Al homo kiu scias bone, kio subjunktivo kaj imperativo estas, tiu paragrafo pruvos la direktan kontraŭon.

Mia temo restas tial tute pruvita. Ĝi estas nun ĝuste tiel certa kiel  $1 + 1 = 2$ , aŭ kiel teoremo de Eŭklido estas. Mi skribas tial Q.E.D.

Sed legantoj demandas de mi, “Kial la Doktoro nomas ĉiam tiun ĉi modon ordona?” Mi respondas, “Ĉar tio estas la plej bona nomo por unu el la du ĉefaj oficoj de la modo.” Sed kial li ne donis (diras oni) al ĝi alian nomon, signifantan

“dependa” modo. Eble li ne volis doni du nomojn al la sama afero. Eble la duobla nomo, ordona-dependa, simila al la imperativa-subjunktiva vorto de Sinjoro de Beaufront—malplaĉis al li.

Ĝi malplaĉas al mi ankaŭ, ĉar la modo estas neniam, samtempe, ordona kaj dependa. Mi penis fari bonan Esperantan nomon por ĝi en mia artikolo pri “Esperantaj Terminoj por la Esperanta Gramatiko,” en tiu ĉi gazeto por lasta Aŭgusto. Mia nomo, “postokaza,” estis tute korekta, kaj ampleksis la tutan signifon, sed nur bona gramatikisto povas kompreni tion tuj. Kaj la celo de miaj Esperantaj terminoj estas fari gramatikajn vortojn, kiujn la komencanto tuj komprenos.

Mi vidas nun ke ni devos havi du terminojn por tiu ĉi modo—“ordona” kaj “dependa.” Efektive ĝi estas du distingitaj modoj, kaj ni bezonas du nomojn por ĝi. Mi estas vidinta proponon por ŝanĝi la formon de la unu aŭ de la alia. Sed tio estas tute nenecesa. Mi malaprobas tion decidite.

Ĉar kvankam la du formoj estas samaj, la eksteraj formoj estas ĉiam malsamaj; la subjunktiva formo posedas ĉiam antaŭ si la konjunkcion “ke,” kaj ĉefan verbon antaŭ tio dum la ordona formo posedas nenion antaŭ si. Ni devos tial, de nun, se la Centra Komitato konsentos, priskribi la “u” modo kiel du modoj, la unu sekvanta “ke,” kaj la alia sekvanta nenion. La propono nomi la du la u-modo estas pura mehanikismo, kaj tute malscienca.

## BUDHO, LA SEMISTO.

Tradukita de A. Simon (Frankfurt a/Main).

Foje, kiam riĉa Bramano estis festanta sian dankofeston por la rikolto, la Budho vojiris kun sia almoz-pelveto por ricevi sian nutraĵon.

Kelkaj el la homoj estis respektemegaj, sed la Bramano ekkoleriĝis, kaj diris:

“Decus pli bone al vi laboradi ol petadi almozojn. Mi plugas kaj semas, kaj pluginte kaj seminte mi manĝas. Se vi farus same, vi ankaŭ havus ion por manĝi!”

Kaj la Lumigitulo respondis al li: “O, Bramano, ankaŭ mi plugas kaj semas kaj pluginte kaj seminte mi manĝas.”

“Ĉu vi nomas vin terkulturisto,” rediris la Bramano. “Kie do estas viaj bovoj, kie estas la semo kaj la plugilo?”

La Laŭdatulo parolis; “Kredo estas la semo, kiun mi semadas, bonaj faroj estas la pluvo ĝin malsekigante, saĝo kaj modesto estas la plugilo, mia animo estas la kondukilo, mi metas la manon je la tenilo de la leĝo, serioza volado estas la vipo, kiun mi uzadas, kaj streĉado estas mia plug-bovo. Mi plugas por detruigi la malbonan herbon de la trompo. La rikolto elirante el la semo estas la nemortema vivo de la Nirvano, kaj per tio finiĝas ĉia suferado.”

Tiam la Bramano enverŝis riz-lakton en oran vazon, kaj ĝin prezentis al la Laŭdatulo, parolante: “La instruisto de la homaro manĝu tiun ĉi riz-lakton, ĉar la honorindega Gotamo plugas sulkon portanta la frukton de la nemortemeco.”

## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rizervas tiajn rajtojn.*

“Mi esperas ion diri pri la *Pulman'a* vagono.” Tiun sentencon mi skribis en la lasta fragmento; sed, tiun *Pulman'an* vagonon priskribante, devige mi sekvas la konsilon de Latina frazo *in medias res*; ĉar la sola vidaĵo, kiun prezentas al mi la memoro, estas tiu de du personoj (la onklino kaj mi mem) sidantaj en kvazaŭ alkovo, kiu povas tre komode enteni almenaŭ kvar, eble eĉ ses personojn. Inter du vicoj de tiaj alkovoĵoj mallarĝa trapasejo kondukas de la pordo ĉe la antaŭa al tiu ĉe la malantaŭa flanko de la vagono.

Du seĝoj, iom similaj al kanopoj sen finiĝoj, estas alfiksataj al la alkovflankajoj. Nenion pri ili mi bezonas diri.

Supren rigardante, mi vidas ke, kiel super iu en tegmentĉambro superpendus la tegmento, tiel super ni superpendas kvazaŭ ega kornico, kiu, ĉe la malsupra flanko, estas, per grandaj ĉarniroj, alfiksita al la vagonflankajo. Pri tiu “kornico” mi poste parolos; ĝi ja estas la planko de mia estonta dormĉambro.

Se oni havas la vizaĝon laŭ la direkto de vojaĝo, la fenestro estas ĉe la dekstra flanko. Iom sub la fenestro oni vidas la butonon de elektra sonorilo, kaj iom sub tiu ĉi butono du metalajn ingojn. Puŝinte per fingro tiun ĉi butonon mi venigas nigran kelneron.

“Alportu al ni ion por manĝi, kelnero.” Foririnte li revenas alportante ne “ion por manĝi” sed, ŝajne, tablosupron, ĉe kies unu finiĝo estas subportiloj, kiuj surfaldas sur la supron; sed ĉe la alia finiĝo oni anstataŭigas tiujn ilojn per du hokoj; kiujn hokojn la kelnero enŝovas en la suprenomitajn ingojn. Tiamaniere alfiksita la tablo povas eĉ kontraŭstari kontraŭ la ekskuegoj de Amerika vagonaro.

Ĉar la onklino trovas iom varma la alkovon, la kelnero mallevas la fenestron kaj el la fenestringo levas kadron, kiu enhavas metalfadenan reton tian, kian mi antaŭe priskribis. Sed tra tiu reto tro eniras la vento, pro kio, ankoraŭ mallevinte la kadron li, per hokoj en ingojn, alfiksas ekstere, sur la antaŭan parton de la fenestradro lignan ŝirmilon, kiu tre similas al ega demandpunkto, supro malsupren renversita. Tiu arango permesas ke oni ĝuu aeron sen vento, kaj ne malhelpas ke oni vidu la kamparon.

“La tago venas,” diras la antikva skribaĵo, “kaj ankaŭ la nokto.” Nokto! Mi ne povas eĉ skribi la vorton, sen vidante fantazie tiujn

miradojn da lumpunktoj, kiuj ĉie en la silento de Amerika nokto; inter la branĉoj de arboj; inter la floroj ĉe niaj piedoj, flugas, kruciĝas kaj interplektiĝas, viva pasamento sur la robo de Naturo; ŝanĝante ĉe ĉiu momento en formon eĉ pli admirindan ol antaŭe.

Lampoj de feinoj, en kiuj ĉio estas poeta krom la nomo! Cimoj de fulmo! (Lightning Bugs)!! Vere Amerikanoj estas treege malpoetaj.

Nokto! Ho, ve la poeta sento! Tiun ĉi nokton ni pasigos en vagonaro; for la poezio! Nur prozaĵo estas nia deziro—kuŝiĝi.

Mi venigas atendiston, kaj laŭ la sekvanta maniero li pretigas por ni—dormĉambrojn? Nu, jes. En domo de pupoj ili estus sufiĉe grandaj dormĉambroj.

Unue li mallevas la kornicegon, kiun mi antaŭe priskribis, kaj ĝi, turniĝante sur ĝiaj ĉarniroj, antaŭenfalas kaj fariĝas la plafono de malsupra kaj la planko de supra ĉambreto. Ĉar la du ĉambretoj enhavas en ili nur la spacon de unu alkovo, oni povas supozi ke eĉ la malsupra ne estas tre alta, dum la supra—sed mi poste parolos pri tio.

El la tiel malfermita spaco elfalas dikaj ledaj kurtenejoj, kiuj, dum la tago, estis kaŝataj post la kornicego; kaj kiuj nun tute apartigas de la cetero de la vagono tiujn du ĉambretojn—nian antaŭan alkovon. Ĉar sammaniere oni pretigas ĉiujn la alkovojn, al iu noktmeze enirante la vagonon, estus videbla nur mallarĝa trapasejo inter flankajoj de dikaj kaj pezegaj ledaj kurtenejoj. Mi pensas (sed pri tio mi ne estas certa) ke la kurtenejoj havis ĉe la malsupra finiĝo pezigilojn de plombo.

De tiu supra ĉambreto la atendisto ankaŭ elprenas la litaĵon por la malsupra, sed antaŭe li eltiras inter la du seĝoj de la alkovo kunigaĵon kiu faras el du seĝoj unu kuŝejon. Sur ĝin li aranĝas matracon kaj litkovrilojn, kaj jen malalta sed ne tro malkonvena dormĉambro.

Tion mi ne povas diri pri tiu larĝigita ŝranko la supra ĉambreto (mi uzas la vorton ĉambreto anstataŭ kuŝejo por montri ke ĝi estas ankaŭ vestejo). Ĝi tute ne posedas apartan kuŝejon. La tuta spaco sur la planko estas plenigita je matraco, kaj tiel proksima de la plafono estas tiu ĉi planko ke mi ne povas eĉ sidi sur ĝi sen frapante kontraŭ la plafonon mian kapon. Pro tio mi trovas iom malfacila la agon de senvestigo.



Tamen kiel vestejo la ĉambreto estas tre konvene aranĝita. Ĉion oni metas sur la plankon (aŭ ĉar la lito restas sur la planko eble mi devas diri "sur la lito") kaj pro tio oni ne povas forgesi kien li metis ion ajn.

Kiel pupo sur breto, tiel mi kuŝas. Sed ne! Tiu similaĵo ne sufiĉas. Ni diru kiel pupo malzorge enpakita en keston kiun portas petolema knabo tra la stratoj de popola urbo kaj frapigas kontraŭ la korpon de ĉiu preteriranto.

Ho! tiuj ekskuoj! Kantas la radoj kvazaŭ rekantaĵon triumfan al kiu estas aldonata el diversaj kuŝejoj muziko de multaj nazaj trompetoj kunkonsentantaj nek pri takto, tempo nek klavo.

"E-r-r, bang, bang, klank," kantas la radoj. "E-r-r, bang, bang, klank—e-r-r, bang, bang, e-r-r. (Trompetado!). Ĉu mi iam dormos? e-r-r. . . ."

Mi malfermas la okulojn kaj—jen Mateno.

\* \* \* \*

Dependigitaj de la antaŭa flanko interne mi rimarkis en multaj vagonoj hakilegojn. Ilia uzo, oni al mi diras, estas por trahaki la vagonflankojn, se, pro fajro aŭ ia alia kaŭzo estos necese ke la vojaĝantoj tuj ekfugu la vagonon; kaj mi tre bone komprenas ke foje estus neeble ekfugi per la du pordoj ĉe la antaŭa kaj malantaŭa flanko de la vagono. Ekzemple, se okazus interfrapigo de du vagonaroj.

Feliĉe mi neniam ĉeestis aŭ ĉe interfrapigo aŭ ĉe fajro, tamen mi foje vidis la utilon de kunportado de riparigiloj.

Ni surkuras egan teran remparaĵon kies deklivo estas plenegaj je la plej belaj floroj, kiam subite haltas la vagonaro, kaj de la lokomotivo aŭdiĝis la laŭta frapado de marteloj sur feron. "Kio okazis? Kio okazis?"

"Nenio grava," diras la kondukisto. "Io rompiĝis ĉe la lokomotivo. La riparigo daŭros eble duonon da horo.

Tio sufiĉas: ĉiuj, viroj, virinoj, geinfanoj eliras sur la remparaĵon.

Kia vasta kaj bela vidaĵo! Dum kelkaj

minutoj mi forgesas la vagonaron. Krom la frapado de marteloj ĉio silentas. Estas ja treege trankvile. Eĉ la vagonaro de komercaĵoj kiu post la nia, estante sur la samaj reĵoj, atendas la riparigon de nia lokomotivo, ŝajnas ion aldoni al la trankvileco de la sceno. Neniu plendas pri prokrasto. Ni trovas nin momente en Natura Edeno, kaj laŭ la infanaj kutimoj de ĉiuj Edenanoj (kompreneble mi ne celas la *Edenon* de *Martin Chuzzlewit* kaj *Mark Tapley*) ni okupas nin per la kolektado de floroj. Tiajn dikajn buketojn ni kolektas, ke kiam fine la riparigo efektiviĝas, kaj la vagonaro forrapidadas, ĝi estas, por tiel diri, tute flornamita.

"Kio okazis?" mi demandis ĉe alia okazo kiam subite la vagonaro haltis en plena kamparo.

"Mi nescias," respondis la demandito, "eble—sed li ne daŭrigis la sentencon, ĉar eniras la kondukisto, kriegante:—'Belega vidaĵo! La vagonaro haltos kvin minutojn por ke ĉiu povu ĝin vidi.'"

Belega? jes! Per ligna ponto, kiu super la profundego etendas sin tiel kiel teksaĵo de araneo, ni ĵus estas trapasintaj grandegan fendaĵon kies fundo ni ne povas eĉ vidi. Kiel la stangejoj de pordego de grandegulo altstaras ĉe la buŝo de la fendegaĵo stonegoj, kiuj enkadrigas ridetantan vidaĵon de vastega ebenaĵo. Vilaĝoj, riveroj, kampoj, arbaroj kuŝas antaŭ niaj okuloj tute same kiel se ni vidus scenon de teatro.

Kaj jen eniras unu el la aktoroj—la lokomotivo de longa vagonaro. Jen ĝi kaŝiĝas inter la domoj de vilaĝo; jen la blanka vaporo vidiĝas super la verdaj foliamasoj de arbaro; jen ĝi superkuras sur ponto la riveron. Fine trakurinte la tutan scenon ĝi malaperas dekstren.

Kia pacema vidaĵo! Vere estas tiel kiel se ni vidus paradizon el la buŝo de drakono.

Belega vidaĵo? jes! Sed vidi ĝin en kvin minutoj? Ĉu vere ni povus ĝin vidi eĉ en kvin tagoj.

Sed ĉion Amerikanoj faras rapide. Sopirante mi forveturas!

## STARU, HOMARO STARU!

Originale verkita de Sr<sup>ino</sup> Reddet (Sens).

La okuloj ĉe la tero  
Ne plu serĉu la monerojn,  
Ne disputu, ne militu  
Pri malmulto, inter fratoj.

Kiel Danto per la mano  
Kaj la voĉo de l' gvidisto  
Subtenita supreniris,  
Tiel marŝu al la supro.

Iru tra la fajro, fumo,  
La glacio, la stonegoj.  
Ĉiu rondo transirita  
Via kapo plialtiĝos.

Ĝis vi estos alveninta  
Al la hela radilumo  
Kie ĉiuj unuigos  
En la paco, scio, amo.

## SAVITA DE MORTO.

Originale verkita de Generalo George Cox.

## ĈAPITRO VIII.

Mi estis estinta en dorma speco de malespera letargio tute tra la proceso, sed tuj kiam la juĝo estis anoncita, kaj mi konis la plej malbonan, subita ŝanĝo de sentoj min okkaptis, kaj mi staris fiere rekta dum paroladis la juĝisto, kvankam mi aŭskultis respektete liajn rimarkojn. Mi estis konstatinta la verajn faktojn pri la okazo al mia frato kaj la advokato kiu min defendis, sed kvankam tiu min kredis, tiu ĉi estis evidente nekredema; kaj, multe kontraŭ mia propra volo, mi estis lastmomente alkondukita de mia frato konsenti ke la pretendo de frenezeco estus levata. Oni argumentis, ke se mia vivo estu savita, io eble levigis por pruvi mian senkulpecon; ke la papero povus troviĝi, kvankam ĝis nun ĉiuj penoj por ĝin trovi malprosperis, malgraŭ la grandaj rekompencoj proponitaj en la ĵurnaloj al la trovintoj. Mi nun sentis kiel malsaĝa mi estis permesi al mia advokato alpreni la defendon de frenezeco; tial mi tuj decidis, en respondo al la demando de la juĝisto, rakonti sentime kaj kuraĝe la tutan veron, kaj mi mirigis la ĉeestantaron per mia kvieteco, kiam mi sentime ekparolis jene:—

“Via juĝista Moŝto kaj sinjoroj la juĝantaro. Mi treege bedaŭras, ke mi permesis al tiuj, kiuj kondukis mian defendon, peni savi mian vivon per malindaj iloj. Estas vere, ke dum tiu terura nokto, kiam la malfeliĉulo perdis la vivon, mi ja estis de mallonge freneza, alie mi certe neniam estus farinta tion, kion mi faris, sed pri mia racieco nuntempe, aŭ dum ia alia porcio de mia vivo, ne estis la plej malgranda dubo. Kvankam mi estas certa, ke mia rakonto ne estos kredata, tamen, kiel mi nune staras en apudesto de mia Kreinto, mi ĵuras, ke ĉiu vorto, kiun mi estas elparolonta, estas vera.”

Mi tiam rakontis ĉiun okazaĵon kunigitan kun mia renkonto kun la maljuna sinjoro; nian interparoladon en la vagonaro, kaj kiamaniere okazis la malfeliĉaĵo. Tiam mi daŭrigis klarigi la teruran impreson, kiu la plenumigo de la “fundamento” kreis en mia spirito, kaj kiel la paroloj de la mortantulo: “Ĉu vi ne vidas ke vi estas mortonto, se mi ne skribe atestos, ke mi pafis min mem hazarde?”, tute turnis al mi la cerbon, kiam mi poste subite ekpensis, ke la papero sur kiu estas skribita mia senkulpeco, estas perdita: kiel mi tiam freneze puŝegis la korpon el la vagono, kaj kiel, dum mia

ekscitego, mi nekonscie enmetis en poŝon la monujon de la maljunulo. Tiam mi estis klarigonta, ke mi ne intencis eliri el la vagonaro ĉe Preston Park, ĝis kiam la konduktoro parolis al mi, kiam la juĝisto interrompis min.

“Vi estas certiginta,” diris la juĝisto, “ke la mortinto atestis skribe, ke li pafis sin okaze. Ĉu vi povas memori la ĝustajn vortojn kiujn li skribis sur la papero, kiu, vi diras, forblovigis el la fenestro?”

“Mi povas, via Moŝto, la vortoj estas enradikataj en mian memoron: “*Sciante ke mi havas nur malmultajn minutojn por vivi, mi solene konstatas, ke mi okaze pafmortigis min, dum mi ekzamenadis turnpapileton apartenantan al sinjoro.* . . .”

“La vortoj mem! Li estas tiel senkulpa kiel la infano nenaskita!” ekkrias voĉo ĉe la posto de la juĝejo.

“Kiu estas tiu? Ordonu ke li silentu!” diras la juĝisto.

“Via juĝista Moŝto!” ekkrias la sama voĉo. “Li estas senkulpujo; mi havas en mano la paperon por ĝin pruvi.”

“Tiu persono venu antaŭen, kiu ajn li estu!” diras la juĝisto.

Post iom da prokrasto, pro la amaso en la juĝejo, alta homo milit-miena, puŝas sian vojon antaŭen, kaj eniras la atestantejon.

Ĉiu okulo turniĝis al li. La eksciteco egigis. La popolo en la galerioj starigis; tiuj malsupre eĉ supreniris sur la ŝultrojn de unu la aliaj por ekvidi lin.

“Silentu,” ekkrias oficisto de la juĝejo.

“Nu,” diras la juĝisto, turninte sin al la fremdulo. “Kion vi volas diri, rilate al tiu ĉi okazaĵo?”

“Simple, via Moŝto, ke mi tenas en la mano la paperon mem, kiun la malliberulo certigas esti skribita de la mortinto.”

“Jurigu tiun ĉi sinjoron?” diras la juĝisto.

“Nun, montru al mi la paperon!” li daŭrigas.

“Ĉu vi konas la manskribaĵon de la mortinto, Vihelmo Thompson?” demandas la juĝisto, ekzameninte la paperon.

“Ne, mi ne konas ĝin, via Moŝto.”

“Mi konas ĝin, via Moŝto,” rimarkas advokato levante. “Mi estis lia konsilisto, kaj bone konas lian manskribaĵon.”

“Prenu tiun ĉi paperon, kaj diru ĉu ĝi estas skribita de la mortinto?”

“Ĝi estas, via Moŝto,” respondas la advokato.

“Nun,” diras la juĝisto, turnante sin al la atestanto, “volu diri vian nomon, kaj atesti kiamaniere vi posedigis je tiu ĉi papero?”

“Volonte, via Moŝto, kaj mi esperas ke mi estos la ilo por savi la vivon de senkulpulo. Mia nomo estas Kolonelo George Elliot, kaj mi loĝas ĉe Newton Priory, malmulte da mejloj de Haywards Heath. Hieraŭ mi kaj du amikoj miaj estis ĉe perdrikpafado sur kelkaj kampoj proksime de la London & Brighton Fervojo. Ni sidigis, por tagmanĝo, sur trunko de arbo kuŝanta apud la fervoja plektobarilo. Mia tranĉilo okaze faletis el mia mano inter la arbobranĉoj, kaj klinante ĉin por retrovi ĝin, mi vidis, sub la trunko, la paperon, kiun mi donis al via Moŝto. Mi senzorge ĝin altlevis, kiam mia okulo ekvidis la skribaĵon, kiun mi legis al miaj amikoj, kies unu rimarkis, ke li vidis ĵurnalan anoncon proponantan rekompencan al la trovinto de tia dokumento, kaj li kredas, ke oni ĝin postulas por atesto pri mortiga proceso. Mi serĉis numeraron de “The Times,” kaj trovis la anoncon, kiu petis ke la trovinto sin turnos al Sinjoroj Smith kaj Dawson, Essex strato. Mi iris en ilian oficejon hodiaŭ matene. Komizo klarigis al mi la grandan gravecon de la dokumento, kaj ni veturis ĉi tien, kiel eble plej rapide, sed la juĝejo tiel amasiĝis, ke ni nur malfacile povis eniri ĉe la posta pordo. Mi alvenis nur ĝustatempe por aŭdi la lastan parton de la malliberula parolado, kiun mi mirege aŭskultis; sed kiam li citis laŭvorte ĉion, kio estis skribita sur la papero, kiun mi tenis en mano, tiam mi jam ne povis deteni min, sed interrompis lin per la rimarko, kiun aŭdis via Moŝto.”

“Ĉu vi konas la kulpigiton?” demandas la juĝisto.

“Mi lin ne vidis dum mia vivo, laŭ mia scio, ĝis kiam mi eniris la juĝejon. Mi memoras legi en la ĵurnaloj rakonton pri la supozita mortigo, sed krom tio, mi nenion scias pri li.”

“Dankon,” respondas la juĝisto. “Vi povas malsupreniri.”

“Ĉu vi deziras daŭrigi vian paroladon?” demandas la juĝisto, turnante sin al mi.

“Ne, via Moŝto. Kompata Antaŭzorgo estas pli farinta por fondi mian senkulpecon, ol ia plua parolado miaparte.”

“Malliberulo ĉe la kulpigitejo,” diras la juĝisto.

“Kompata Antaŭzorgo, kiel vi diras, estas intermetinta por ŝanĝi la vidigon de la krimo pri kiu vi estas kondamnita. La leĝoj de nia Lando ne permesas ke plua atestado prezentigu, post la juĝo de la juĝantaro; nek estas permesite al malliberulo alporti al supera juĝistaro kriminalan kulpigon. Tamen, en tiu instanco, mi prenis sur min, en malferma juĝego, aŭskulti la ateston, pro tio, ke ĝi ŝajnis tiel strange pravigi la certigon kiun vi faris, rilate al via senkulpeco; sed la juĝantaro ne povas nun ĝin konsideri; sia devo finigis kiam ĝi elparolis la juĝon de mortigo. Mi ne povas ne diri, kiel malsaga estis via konduto. Mi povas bone imagi vian spirit-staton, kiam la “fundamento de la romano” fariĝis reala fakto, kaj kiel, kiam vi ekkomprenis ke la papero, certiganta vian senkulpecon, estis perdita, ke vi, pli malpli, ne estis responda pri viaj agoj; sed kaŝi la verajn faktojn, kiam la racio al vi revenis, estis ne sole malsage, sed riproĉinde kaj malprave. Raporto pri la okazaĵoj de via proceso, estos sendata al la Ŝtatestretario, kaj dume vi estos resendata ĝis kiam la plezuro de Ŝia Reĝina Moŝto estos sciigita.”

Aplaŭdego, kiu estas baldaŭ subpremata, supreniras de la amaso. Mi salutas la juĝiston, kaj forlasas la juĝejon sub gardo de la malliberejaj gardistoj.

## ĈAPITRO IX.

Restas malmulto por diri por plenigi tiun ĉi ekstraordinaran okazaĵon el mia vivo. Mi estis tenata en malliberejo dum la afero estis esplorata de la Enlanda Sekretario, sed matene de la kvara tago post la proceso, la pordo de mia kelo malfermiĝis, kaj la mallibereja estro, sekvata de mia frato, eniris.

“Mi havas grandan plezuron por sciigi al vi, Sinjoro Middleton, ke vi estas ricevinta la pardonon de Ŝia Reĝina Moŝto, kaj ke vi nun estas liberulo,” diras la estro, donante al mi varman manprenon.

“Mi devas efektive dankegi al Dio, kiu min savis de malnoblega morto,” mi respondas, kore reciprokante lian amikan manpremon.

LA FINO.

## LA SAGO KAJ LA KANTO.

Verkita de Longfellow.—Esperantigita de Esperantisto 9639.

Mi pafis sagon en l' aeron  
Ĝi falis ie sur la teron.  
Rapida estis la flugado  
Kaj sekvi povis ne vidado.

Mi spiris kanton en l' aeron  
Ĝi falis ie sur la teron;  
Sed kie sin vidanto trovas,  
La kanto-flugon sekvi povas?

Post longa tempo, unu tagon,  
En kverko trovis mi la sagon;  
Kaj, ŝategatan kiel oro,  
La kanton en amika koro.

## ESPERANTISTA ORGANIZA KOMITATO.

25<sup>an</sup> de Septembro, 1905.

Por prepari kiel eble plej rapide la efektivigon de la decidoj de la unua internacia kongreso okazinta en "Boulogne-sur-Mer" de la 5a ĝis la 13a de Aŭgusto, 1905, aparte pri la starigo de la provizora lingva komitato kaj de la provizora komitato de organizado, la membroj de tiu ĉi lasta komitato ankoraŭ ĉeestantaj en "Boulogne" antaŭ ol forvojaĝi el tiu urbo kaj laŭ la insista peto al ili farita de Doktoro Zamenhof, prenis la jenajn decidojn, al kiuj poste aliĝis skribe la ceteraj membroj de la dirita komitato.

Por efektivigi unuecon kaj ordon en la laboroj kaj agoj de ambaŭ komitatoj, sub la konstantaj direktado, kontrolado kaj inspirado de Doktoro Zamenhof, estas elektita oficeja sidejo sendependa de ĉiu jam ekzistanta Esperantista grupo aŭ societo, kaj provizore fiksita en Parizo, "51, Rue de Clichy."

La ofico de la korespondoj koncernantaj, ĉu la lingvan, ĉu la organizan komitaton estos alcentrigata per la zorgoj de la sekretario-agento de la oficejo, kiu havas la taskon sendi tiujn korespondojn al la koncernata komitato kaj plenumi la donotajn sekvojn.

Provizore ankaŭ S<sup>ro</sup> Rektoro Boirac kaj S<sup>ro</sup>

Generalo Sebert, laŭ la deziro de D<sup>ro</sup> Zamenhof, akceptis efektivigi, ĉiu siaflanke, la apartajn direktadojn de ambaŭ komitatoj.

Laŭ la peto esprimita ankaŭ de D<sup>ro</sup> Zamenhof mem, kiu tre deziras la malpliigon de la laboro kiu lin premas, ĉiujn korespondojn pri demandoj rilataj al Esperanto oni devos sendi principe al la Prezidanto de la komitato kiun la afero koncernas, per adreso de la centra oficejo, kaj evitante kunmiksi sur sama folio demandojn samtempe rilatajn al ambaŭ komitatoj aŭ eĉ al diversaj aferoj.

LA ESPERANTISTA ORGANIZA KOMITATO.

D<sup>ro</sup> ZAMENHOF, *Prezidanto*.

S<sup>roj</sup> BOIRAC, MICHAUX, MYBS, POLLEN, SEBERT,  
*Vic-prezidantoj*.

S<sup>roj</sup> BOULET, DERVAUX, GRABOWSKI, KÜHNL,  
*Sekretarioj*.

*Modeloj de Adresoj uzotaj :*

*Al Prezidanto de la Esperantista Organiza Komitato*  
*aŭ*

*Al Prezidanto de la Esperantista Lingva Komitato,*  
*Esperantista Centra Oficejo,*

51, rue de Clichy, Paris.

## L' INFERO DE DANTO.

Unua Kanto.—Tradukita de D. H. Lambert, B.A.

Okaze, en mezvoj' de vivo nia  
Mi trovis min arbar' en malbrilanta,  
Vaginte el vojeto rekta mia.  
Ho, kiel estas korglaciiganta  
La penso pri sovaĝa tiu forta  
Terura loko : pli eltimiganta  
Ne povus esti la ĉeesto Morta ;  
Sed nur por pruvi kiom da bonaĵoj  
Mi tie trovis faros mi rakonton.  
Mi ne sciigis pri la serpentaĵoj

De la vojetoj, ĉar—vi mian honton  
Pardonu—dormemeco de sentaĵoj  
Delogis min, kaj perdis mi la fonton  
Intelligentan kune kun la celo.  
Sed kiam mi al mont' alproksimigis—  
La fino de la val' malluma—helo  
Plenigis min, ĉar antaŭ mi levigis  
La monto lumigite de la Stelo,  
Per kiu ĉiuj ĉiam kondukigis.

## LA LASTA ROZO DE SOMERO.

(El T. Moore).

Jen floras sola, forlasita  
La lasta rozo de somero ;  
Dum ĝia ĉarma gefratara  
Velkinte, kuŝas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca,  
Nek roz-burgono en proksimo,  
Por elŝanĝadi la ruĝigojn,  
Aŭ la gemetojn laŭ kutimo.

Ili vin ne lasos, tro soleca !  
Ĉagrene sur trunketo brili ;  
Ĉar la karuloj viaj dormas,  
Do iru, dormu vi kun ili.  
Foliojn viajn mi afable  
Dissemas sur bedeto jena ;  
Vi kuŝu ĉe la senaroma,  
Malviva kunular' gardena.

Mi tiel sekvu, kiam pasos  
Del' amikeco flor' fidela,  
Kaj el brilanta Ama ringo  
Elfalos lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj,  
Sentemaj iris for el rondo,  
Ho ! kiu volus tiam logi  
Solece en malvarma mondo ?  
A. GRABOWSKI.

26. (Vol. II., No. 12.)

THE

December, 1905.

# ESPERANTIST

La Esperanta Gazeto por la  
Propagando de la Internacia Lingvo.

ANNUAL SUBSCRIPTION: 3/- (4 francs; 1½ roubles; 75 centes.)

Wholesale Agents: 21, Carter Row, London, W.C.

All Communications should be sent to THE EDITOR, G., Kensington Gardens Square, London, W.

## CONTENTS.

|   | Page |
|---|------|
| THE THREE MEN OF KIRKILLAR (W. H. Ross) ... ..                                  | 177  |
| SINGE DE THE WIND (A. Grelbowicki) ... ..                                       | 178  |
| THE TIN HAT (Marian Westcott) ... ..  | 179  |
| LEVER AS A WINTER RESORT (Marian Westcott) ... ..                               | 182  |
| THE NET (Lark) (translated by E. Pryor) ... ..                                  | 180  |
| REVUE DE (Diana Robby) ... ..   | 181  |
| TRADUITE DE KILBY (E. 10643) ... ..   | 181  |
| TO THE WIND (E. J. Carr) ... ..   | 181  |
| HE, SHE, IT AND ANOTHER (Dyanna) ... ..   | 182  |
| SENDAJE ADVANTAGE DE A. SENSITIVE (Dikland) (translated by A. A. Coward) ... .. | 184  |
| STRENGTH IN VALUE THE NET (translated by D. L. D. and C. R. W.) ... ..          | 185  |
| THE OLD HOUSE (translated by Eleanore Dickson) ... ..                           | 186  |
| ESPERANTO HOMOVIDE (H. South) ... ..  | 187  |
| MEMORANDUM, Part XII (Ed. Melsell, M. A., Oslo) ... ..                          | 187  |
| A FORTYMAN BIRD (E. 1630) ... ..  | 187  |
| BIRDING ... ..  | 189  |
| ESPERANTO BY THE ROOF OF PIZAZ (translated by W. M. Bassett) ... ..             | 184  |

Stampo editado  
No. 1070.

## THE ... ESPERANTO BLEND.

Registered Trade Mark, No. 276281  
Registered Label No. 276282

THE ESPERANTO BLEND is a combination of the finest Scotch Whisky, the highest quality of malted, and of special interest to Esperantists, as the label has been designed to serve as a "business card." A liberal PUBLIC APPOINTMENT will be granted to bona fide Esperantists who comply with the conditions, which can be ascertained on application to our sole Dispensary.

**BUEHANAN, SCOTT & CO.,**  
Gartland Street, Glasgow,  
Scotland.

TRADE MARK PATENTED BY BUEHANAN, SCOTT & CO.



# THE ESPERANTIST

The Esperanto Gazette for the Spread of the International Language.

ABONPAĜOJ ESTAS RICEVEBLAJ ĈE  
SUBSCRIPTIONS SHOULD BE SENT TO

H. Bollingbroke Mudie, Esq., 67, Kensington Gardens Square, London, W.

AUSTRIA.—Bro. T. Čejka, Bystrice Hostyn, Moravia.

BELGIUM.—M. M. Seynaeve, 3, Rue de l'Avenir, Courtrai.

FRANCE.—Grupo Pariza, 28, rue Serpente, Paris.

GERMANY.—Doktoro Myba, 68, Markt Strasse Altona, Elbe.

NEW ZEALAND.—Esperanto Society, P.O. Box 50, Auckland.

RUSSIA.—Societo Espero, Bol Podjaceskaja 24, log 12, St. Petersburg.

SWEDEN.—Bro. P. Ahlberg, 50, Döbelngatan, Stockholm.

N.B.

*Nepresitajn manuskriptojn la Redakcio resendos se oni aldonis poŝtmarkon.*

*Alsendatajn artikolojn la Redakcio laŭ bezono korektos.*

*Oni povas sendi la abonpagon per poŝtmarkoj, kiuj estas akceptataj laŭvaloro.*

*Oni sendu ĉiujn artikolojn, demandojn kaj avizojn al La Redaktoro, 67, Kensington Gardens Square, London, W.*

N.B.

26. [Vol. II., No. 12.]

DECEMBRO, 1905.

Subscription, 3s. Per Annum.  
Single Copies, 4d. net. Nos.  
2 to 13, 6d. each; Later Issues  
4d. each, net.

## LA MUTULO DE KIRKMILLAR.

Norda Legendo.—Verkita de William Officer.

En la paroĥo de *Kirkmillar* estas tre antikva kastelo. Ĝi nun ruinigis; sed kelke da maljunaj personoj, ankoraŭ vivantaj, memoras tempon, kiam ĝiaj muroj estis pli malpli sendifektaj.

Antaŭ multaj jaroj ĝi estis kredita esti la loĝejo de fantomoj; kaj multe da strangaj rakontoj pri ĝi disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵo. La kamparanoj ĝin rigardis je tia teruro ke ili ne havis kuraĝon ĝin preterpasi post la sunkuŝigo.

Je la tempo pri kiu ni skribas, loĝis—tiel diras la legendo—en *Kirkmillar* masonisto, ĉarpentisto, kaj botisto, kiuj estis ĉiamaj kunuloj. Kune ili pasigis la vesperojn, interparolante pri siaj metioj, kaj diskutante ĉiujn gravajn demandojn de tiu epoko. Ofte, aŭkaŭ, ili vizitis la paroĥan drinkejon, por sin refreŝigi per glaso da viskio, aŭ biero.

Unu nokton, dum ili sidis ĉe la drinkejtablo, la ĉarpentisto rimarkis pri la antikva kastelo kaj ĝiaj teruraĵoj.

“Ĉu vi efektive kredas,” diris la botisto, “ke estas fantomoj en la kastelo?”

“Mi imagas ke ĉiu en *Kirkmillar* kredas tion.”

“Permesu al mi diri ke vi multe eraras. Mi tute neas la ekziston de fantomoj, aŭ en *Kirkmillar* kastelo, aŭ aliloke.”

“Kion vi diras,” ekkriis la masonisto. “Mi vetas ke vi ne iros en la kastelon sole je noktmezo.”

“Kiom vi vetas?”

“Dek ŝilingojn.”

“Mi akceptas; kaj tuj gajnos la veton. Kioma horo estas nun?”

“Preskaŭ la deknua.”

“Nu, mi decidis fari la eksperimenton hodiaŭ nokte. Ni trinku alian glason antaŭ foriri.”

Post proksimume unu horo la tri homoj haltis mallongan distancon for de la kastelo.

“Ĉu vi ankoraŭ intencas gajni la veton?” diris la masonisto.

“Certe. Estas nenio por timi,” respondis la botisto, forpaŝante al la kastelo.

Baldaŭ li malaperis en la mallumo; kaj liaj du kunuloj atendis la rezultaton.

Post dek minutoj la *Kirkmillar* preĝeja horloĝo ekbatis la dekduan horon; kaj la masonisto kaj ĉarpentisto aŭdis nenaturajn sonojn, kaj vidis strangajn lumajojn elveni el la ruinaĵo.

Horo post horo pasis; sed la botisto ne reaparis. Fine tagiĝis; kaj la du homoj singardeme alproksimiĝis la kastelon. Kiam ili atingis la larĝan enirejon ili tuj vidis sian kolegon. Li kuŝis sur la tero en la granda vestiblo; kaj apud li staris kio sajnis esti fantoma virino blanke vestata. Je la sono de iliaj piedfrapoj la fantomino malaperis; kaj la botisto levis sian kapon.

Al ĉiuj iliaj demandoj li respondis per kapskuo; kaj de tiu tago li estis tute muta. Li vivis multajn jarojn; sed neniam per rigardo aŭ signo aludis al sia sperto en la kastelo.

Multe da *Kirkmillaranoj* eldiris ke, kiam ili lin renkontis, ili vidis la blankan fantominon subite malaperi de lia flanko; kaj kelkaj personoj eĉ certigis ke, post lia morto, la sama fantomino ofte vizitis lian tombon.

## KANTO PRI L' VENTO.

(El Leo Belmont).—A. Grabowski.

Se havus mi forton kaj spiron de l' vento  
De l' viv' aliĝus fason' ;  
Mi estus semanto de ama la sento,  
Ŝiranto de ĉia malbon'.

Per polvo friponojn blindigus mi kure,  
Falegus malver' bastion' !  
Mi kverkojn fierajn fleksadus terure,  
Karesus je roza la kron'.

Mi plorus poeton, sur tomb', kun betulo,  
Mi vipus la maron sen lac' ;  
Sur vojo ŝtonegojn mi skuus, fortulo,  
Ke mugus la nokt' per minac'.

La poplon maljunan al dormo lulante,  
Ridetus mi kun l' akaci' ;  
Fluginte sur kampon, sonorus mi kante,  
Ho ! forton de l' vento al mi !

## "LA FUMPOTĈAPELO."

De Martyn Westcott.

Ĉu mi songas ?—aŭ ĉu la malbelega fumpotĉapelo vere malpopulariĝas ? Ĝia nomo mem estas malbela Angle (*chimney-pot hat*). Eŭfeme, ni povas ĝin nomi "silka ĉapelo," sed tiu ne ŝanĝas ĝian malbelan formon ! Kaj en la proksima centjaro sendube la idoj diros al siaj geavoj—"Apenaŭ ni povas kredi ke personoj en tiuj tempoj portadis tiajn absurdajn ĉapelojn ! Ili similas la forntubon en la kuirejo ! Kaj ili nepre estis varmegaj kaj pezaj ! Kiu ilin elpensis ?"

Nu, la silka fumpotĉapelo estas la elpenso de fadenisto Londona. Jes ! la malbelegaĵo estas certe elpenso Angla. Mi ĝin multe bedaŭras, sed mi devigos tion konfesi. La nomo de tiu eraranta komercisto estis Hetherington—bona nomo Angla, kiel vi vidas.

Kaj rakonto de lia agado efektive aperis en la *Times* de la jaro 1797 ! La silka-ĉapelo ja ekzistis dum cent ok jaroj !

Nu, la ĉapela komerco estis tre malbona, kaj la dandoj de tiu epoko ne aĉetus ĉapelojn tial ke ne ekzistis eĉ unu speco reale eleganta. Hetherington estis fasonema komercisto, kaj liaj amikoj ofte petis ke li ion tute novan elpensos. Fine li faris—fumpotĉapelon. Li laboris tute sekrete ĝis la unua ĉapelo finiĝis. Tiam, tagon tre malfeliĉan por ni, mi opinias, li montris la novan elpenson al siaj edzino kaj idoj.

"Ho ! patro ! sed kiel malbela ĉapelo !" ili ekkriis.

"Malbela !" li kriis, indignante kaj kolere.

La edzino kaj infanoj petis kaj petegis lin ke li ne foriru sur la straton kun tia ĉapelo ; sed li koleriĝis plie, kaj fine li lasis sian domon, brue ekfermante la pordon !

Estas kredeble ke neniam ni estus sciintaj ĝuste

la datumon, je kiu tiu ĉi mallerta ago okazis, sed tuj kiam la fumpotĉapela komercisto iris sur la straton, amaso da buboj kaj bubinoj lin tuj sekvis, ĉiam kriegante. La geurbanoj ankaŭ lin sekvis, reciproke demandante ĉu la bona komercisto freneziga ? Kaj fine, Hetherington arestiĝis, tial ke li kaŭzas tumulton en la publikaj stratoj ! Kaj kiel la policanoj (aŭ gvardanoj, kiel ili tiam estis) lin kondukis al la juĝejo, la hundoj bojis, la infanoj ekkriegis kaj ĉiuj kredis ke li estas frenezulo. Nu, la tiea magistrato estis la *Lord Mayor*,<sup>1</sup> antaŭ kiu Hetherington estis kondukata.

La policanoj plendis ke la komercisto, per sia absurda kaj malbela ĉapelo, timigis la infanojn, kolektis grandan amason, kaj ke malgranda knabo kies nomo estas *Thomas Cordwainer*, tratabiĝis per la piedoj de la amaso, kaj ricevis brakon frakasitan. Hetherington fiere konstatis ke li estis Anglo, kaj ke pro tio li certe havas la rajton porti ian ajn ĉapelon ! La magistrato diris ke li unue tumulton faris, kaj ke, tial, li devigos garantii plibonan konduton estontan per pago da libroj kvincent !! Certe tiu estis tre severa juĝo ! Mi kredas ke la komercisto neniam perdis sian monon, ĉar poste multe da personoj aŭdis pri la nova ĉapelo kaj baldaŭ la malbelaĵo iĝis tiel populara kiel eĉ Hetherington volis.

Antaŭ malmultaj jaroj, nur la dandoj, sinjoroj, kaj profesianoj portis tiujn ĉapelojn, precipe dimanĉojn. Malfrue, kiam ĉiuj kiuj estis sendependaj ekĉesigis ilin porti, la komercistoj kaj komizoj alprenis ilin kiel oficialaj kaj komercaj ĉapeloj. Ĉe multaj oficejoj Londonaj la komizoj devigas porti tiujn malbelajn ĉapelojn eĉ en la varmega vetero.

Mi tute ne dubas ke, estonte, nur laboristoj kaj



metiistoj portos la fumpotĉapelon, kaj ĉe ili, ĝia vivado estos ja mallonga!

Ĉu mi songas do? Ĉu la forntubo reale malpopulariĝas, aŭ ne? Ni eklernas iom da higieno—ni scias bone ke la kapo bezonas ventolecon, kaj ke tiuj pezaj ĉapeloj estas respondaj pri la senhareco de iuj el ni; ni lernadas iom pri arto—

kaj ni vidas ke la *f*—o estas malbela, malbelega; ni pli kaj pli deziras komforton, kaj ni tre bone scias ke la *f*—o estas tre malkomforta. . . . kion do? ni forlasu la fum-potĉapelon! Kiu aliĝos kun mi la Kontraŭ-Fpĉ-Brigadon?

<sup>1</sup> Urbestro de Londono.

## EGIPTUJO KIEL VINTRA LOĜEJO. Martyn Westcott.

Estas je tiu ĉi sezono de la jaro ke personoj riĉaj kaj riĉetaj, kaj personoj de la libertempaj klasoj ekpripensas pri regiono, en kiu ili povos pasigi komforte kaj plezure la vintron. Ekzistas granda, kaj, mi opinias, ĉiame-grandiganta nombro da tiuj, al kiuj diris la kuracisto "Vi devos vintrumi alilande." Inter tiuj estas multaj kiuj suferas nur de enuo, fantazio malsana kaj manko da laboro difinita, sendube; sed ankaŭ inter ili estas tiuj, kies brustoj estas "delikataj," kiuj devas esti "tre zorgemaj," kaj suferas eble de renaj aŭ hepataj malsanoj. Al ĉiaj tiaj personoj, kiel ankaŭ al la lacaj cerb-verkantoj, la aŭtoroj, la dramaŭtoroj, la Parlemtanoj kaj tiel plu, Egiptujo vintre oferas klimaton ĉiam agrablan, kaj scenaron de tipo tute nevidebla en Granda Britujo kaj la Kontinento Eŭropa kaj ankaŭ objektoj posedantaj interesan historian malsuperan al nenia intereso en la mondo. Estas en hodiaŭa Egiptujo multe da diverseco. La viro kun gustoj modernaj trovas ĉe Kajro urbon kosmopolitan plenan je fremduloj interesigaj, kaj bonaj hoteloj; kaj tre apude, la antikvan urbon de la Mamelukoj, kaj Kalifoj. Se oni preferas la allogaĵojn de la vivo moderna antaŭ aferoj historie-interesaj ne disreviĝos je moderna Kajro. Dum "la sezono" estas baloj, dancadoj, *bridge*-kunvenoj, tute same kiel en ia alia urbo. Kaj kiam tiaj aferoj supersatas vin, jen grandegaj monumentoj, la Piramidoj, la Sfinkso, kaj multe da temploj kaj tomboj! La vojaĝanto kiu malsukcesas tiajn aferojn trovi interesaj, certe bezonas fantazion! En Kajro mi ofte miregis, demandite "Ĉu estas dezirinde vojaĝi laŭ la rivero? Kion oni faros tie?" . . .

La senegala karaktero de la Nilo mem aparte, la urboj modernaj sur la bordoj de ĝi, konstruitaj sur la sidoj kaj inter la ruinaĵoj de la antikvaj urboj kvar ĝis dek-mil-jaraj, estas ja vidindaj. Tie ankaŭ ekzistas hoteloj ĉiugradaj, kiuj ne estas tro altprezaj. Je pli ol unu okazo mi aŭdis diri virinojn ke la dek-kvar-taga vojaĝeto sur la Nilo estis inter la plej dolĉaj spertoj en siaj vivoj!

Kajron mem mi trovas enuiga; sed la granda rivero neniam lacigas. La vivado en la riveraj vaporsipoj estas plena je diverseco kaj intereso.

La tre oftaj ekskursoj azendorse tra la dezerto, kaj ĝia hela seka aĉro, la mirindegaj antikvaj temploj kaj tomboj, kaj la dolĉa klimato kune ĝuebligas la tutan vojaĝon kaj ĝin faras neforges-ebla! Plimultiĝa nombro da vizitantoj ĉiujare pasas preter *Assouan*, la landlima stacio, por viziti *Kartum* kiu grandigis mirinde sub Brita protekto, kaj nun enhavas hotelojn kaj konstruaĵojn gravajn.

Ofte oni al mi petas detalojn praktikajn pri elspezoj kaj loĝejoj en Egiptujo dum la vintro. Kompreneble estas malfacile taŭge respondi. Alveninte en tiu lando oni devas kalkuli tiom elspezi kiom li ĝenerale elspezas, vojaĝante en la Eŭropa kontinento. La vojaĝoj en la unua-klasaj vaporsipoj estas sufiĉe altprezaj ĉar *Cook* kaj la *Anglo-Amerikana* kompanioj havas tie monopolon. Ambaŭ ŝipe kaj lande, tamen, zorgata de *Cook*, oni povas ĝui ĉion la plej bonan.

La azenoj estas bonegaj, kvietaj kaj facile-rajdeblaj de ĉiuj eĉ tute sen rajda sperteco; kaj ĝenerale estas la gviduloj Arabaj sufiĉe lertaj kaj ĝentilaj. Ekzistas tie ankaŭ bonegaj gvidlibroj, precipe unu de *Dro Wallis Budge* verkita. La hodiaŭa Egiptujo ne nur estas tenejo da antikvaĵoj senprezaj, tamen; oni povas egale tie vidi modernajn triumfaĵojn de inĝenierado—tiaj kiaj estas la grandega dig-ponto ĉe *Assouan* antaŭ ne longe konstruita, kaj la pli eta digoj ĉe *Assiut*—kaj multajn aferojn ankaŭ, interesaj sociologie.

Pri la klimato de Egiptujo mi devas iom paroli. La foresto da pluvo certigas la sekecon de la aĉro, kaj la situacio geografia de la lando al ĝi donas vintron varman. La temperaturo, tamen, malofte superas 80° *Fahrenheit* eĉ en la dezerto, kaj sur la rivero mem, nokte kaj frua-matene, ofte estas preskaŭ malvarme, kompare (ekz., 60° F.). Tial mi konsilas al ĉiuj kiuj intencas en Egiptujo vintrumi, ke ili kunportu sufiĉe da varmega vestaĵo, precipe subvestaĵo—kaj ne atendu somermezan hejton sur la ferdekoj de la vaporsipoj. Novembro—Februaro estas la plej bonaj monatoj, sed nur ĉe tiuj, kiuj malŝatas varmecon someran estas malagrablaj Marto kaj Aprilo.

## LA MARO.

El "Romano de Infano," de Pierre Loti.

Esperantigis Edmond Privat, ĉefredaktoro de la revuo: "Juna Esperantisto."

Mi volus provi nun diri la impreson, kiun faris al mi la maro, kiam mi ĝin unuafoje vidis.

Tiu ĉi estas vespera impreso; oni apenaŭ povis vidi, kaj tamen la aperinta figuro estis tiel forta, ke ĝi unufrape por ĉiam gravurigis. Kaj mi ankoraŭ retrospektivan tremfroston sentas, tuj kiam mi tutspirite pripensas tiun memoradon.

Mi alvenis vespere, kun miaj gepatroj, en vilaĝon de la *Saintonge* marbordo, en domon de fiskaptistoj luitan por la bansezono. Mi sciis ke ni tien venis por io nomata "la maro," sed mi ĝin neniam vidis jam (linio de sablaj montetoj kaŝis ĝin al mi, pro mia tre malgranda kresko) kaj mi estis tre malpacienca ĝin koni. Post la vespermanĝo, je la eknoktigo, mi do forkuris sola eksteren. La aero malvarmeta, maldolĉa, odoris ion nekonatan, kaj stranga bruado, samtempe mallaŭta kaj vastega, farigadis malantaŭ la sablaj montetoj, kien kondukis vojeto.

Timigis min ĉio, tiu nekonata vojeto, tiu krepusko falanta el kovrita ĉielo, kaj ankaŭ la soleco de tiu angulo de la vilaĝo. . . . Tamen, armite per unu el tiuj grandaj subitaj decidoj, kiajn prenas kelkfoje plej timemaj bubetoj, mi foriris rapidpaŝe.

Sed, subite, mi haltis frostita, tremante pro timo. Antaŭ mi, io aperis, io malhela kaj bruanta, aperinta ĉiuflanke samtempe kaj ŝajnanta ne havi finiĝon; moviĝanta spaco, kiu donis al mi la mortigan kapturton. . . . Sen ia dubo *tio estis ĝi*; nek unu minuto da ŝanceliĝo, nek eĉ da mirado *ke ĝi estas tiel*, ne, nur teruro; mi *rekonis*

kaj tremadis. *Ĝi* estis malhelverda, preskaŭ nigra; *ĝi* ŝajnis senfirma, perfida, englutanta; *ĝi* moviĝis kaj ruliĝis ĉie samtempe, kun ŝajno de funebra malboneco. Supere, etendiĝis unupeca ĉielo, malhelgriza, kiel peza mantelo.

Tre malproksime, nur tre malproksime, je nekal-kuleblaj profundaĵoj de horizonto, oni ekvidis ŝiraĵon, lumaĵon inter la ĉielo kaj la akvo, longa fendo malplena, flave helpala.

Por tiel *rekon*i la maron, ĉu mi ĝin jam estis vidinta?

Eble, senkonscie, kiam, estante aĝa kvin aŭ ses monatoj, min oni kondukis en la *insulon*, ĉe praonklino, fratino de mia avino. Aŭ ĉu ĝi estis tiel ofte rigardata de miaj maristaj praavoj, ke mi naskiĝis havante jam en la kapo malklaran rebrilon de ĝia grandegeco? Ni restis momenton unu antaŭ la alia, mi de ĝi ensorĉata. De tiu unua intervidiĝo sendube, mi havis la nekompreneblan antaŭsenton, ke iam fine ĝi min prenos, malgraŭ ĉiuj miaj ŝanceliĝoj, malgraŭ ĉiuj voloĵoj kiuj provos min deteni. . . . Tio, kion mi sentis antaŭ ĝi, estis ne nur teruro, sed ĉefe nedirebla malgajeco, impreso de ĉagrenega soleco, de forlaso, de ekzilo. . . . Kaj mi reforiris kurante, kun vizaĝo tre malĝoja, kredeble, kaj la haroj turmentataj de la vento, kun treega rapideco por alveni al mia patrino, ŝin kisi, min premi kontraŭ ŝi; konsoligi al mi mil animturmentoj aŭtaŭaj, neesprimeblaj, kiuj premegis mian koron, vidante tiun grandan spacoun verdan kaj profundan.

## REVADO.

Originale verkita de Srino. Reddet (Sens).

En flora ĝardeno de l' revoj  
Mi iris dum nokto promeni  
Tra l' arboj, la freŝaj kreskaĵoj  
Ĉarmite mi paŝis sen halti.

Mi vidis la bluan floretan,  
La floran kun palaj folioj,  
Mi prenis lazuran ludilon  
De la dudekjaraj geknaboj.

Mi vidis la floran purpuran,  
La brilan emblemon de gloro;

Mi vidis la floran malhelan  
Kaŝantan la lumon en koro.

Mi vidis poetan la floran  
Post tiu de l' blanka edzino:  
El ĉiuj kolektis garbeton  
Ĝis blovis, frostega, la vento.

Kaj tiam, forkuris rapide  
Timante ke ĝia flugilo  
Forportos parfumojn subite.  
De mia odora rikolto.

## DIALOGO PRI ELIZIO.

Originale verkita de Esperantisto 10549.

*Kritikisto.* Amiko mia, vi estas alie admirinda poeto, sed vi treege amas haki la vostojn. La troa eliziemo ne estas aprobinda. Mi malamus fortranĉi la voston aŭ al vorto aŭ al besto.

*Poeto.* Sed vi ne estas poeto.

*K.* Mi estas nek poeto nek ĥirurgiisto, sekve la kompatinduloj ne timas mian dispecigemon.

*P.* La versfarado, same kiel la medicina scienco, postulas la vivo-sekcion.

*K.* Sed tio ne senkulpigas kruelecon senbezonan. La modelaj verkistoj en la *Fundamenta Krestomatio* ŝpareme uzas tranĉilon.

*P.* D<sup>ro</sup> Zamenhof mem elizias.

*K.* Malofte severe. Lia longa poemo "*Al la Fratoj*" estas preskaŭ tute sen elizio. Dufoje li tranĉas la artikolon, sed nenion plu.

*P.* Li ankaŭ verkis la kanton "*Al la Reĝo*."

*K.* Bedaŭrinde jes! Jen bela poemo difektita per molmodera eliziado.

*P.* Ĉu vi kritikis eĉ la Elpensintou de Esperanto?

*K.* Oni kritikis ĉiun eminentulon. Eĉ la suno enhavas makulojn. Ju pli verkisto estas laŭdinda, des pli li estas kritikinda. Tamen iometo

da maldeco ne kontraŭpezas la tutan indon de plej granda poeto. Ordinare la majstro estas tre humana verkisto, kaj li tranĉas malmulte.

*P.* Tranĉi estas neeviteble.

*K.* Ne absolute. En "*Alaŭdeto*" kaj en aliaj modelaj kantoj, mi vidas plezure ke ĉiuj la vortoj, senescepte, gaje skuetas siajn vostojn nevunditajn.

*P.* Elizio plibeligas poemon.

*K.* Pardonu al mi. Vort' en poem' ofte similas al soldat' post batal', aŭ al kat' kiu sengarde sidigis en kuniklokaptil', kaj al poem' alie belul' alvenas mien' de malsanulej'.

*P.* Vi do tute malŝatas elizion.

*K.* Ne tute. Sed estu diskreta, kaj kompatu la vostojn. Ne decas operacii kvazaŭ per falĉilo.

*P.* Kion vi proponas kiel la plej bona modelo de rima stilo?

*K.* Preskaŭ la tutan poemaron en *Fundamenta Krestomatio*, malgraŭ la elizioj. Sed ne tranĉegu sovaĝe. Ne faru tiom da kripluloj. Ne estu sangavida. Ni ne estas en Mandĉurio!

*P.* Ŝajnas al mi ke vi estas prava.

*K.* Nehakita kanto estas rava.

## AL LA KORBO POR FORĴETAĴOJ.

La plej humila sed tre utila membro de la Redakcio, kun plena respekto de la Verkistino, E. J. Catt.

## KARA KORBO,

Laŭ la interesaj enhavoj de la THE ESPERANTIST, la mondo, aŭ pli bone ĝiaj loĝantoj, tiel saĝigas kaj tiel klare verkas, ke la ideo sin prezentis al mi ke ci malofte, aŭ eble neniam, ricevas donacon.

Tiu ĉi pensado kortuŝas min. Ne balancu la kapon (aŭ cian tenilon) kun mieno de malespero. Sendube ci baldaŭ repleniĝos—ĉar mi estas verkonta iom speciale por ci, ho kara Korbo, por ci sole, kiel esprimo de simpatio.

Estas nur simpla (sed tamen vera) anekdoto, kaj tute negrava. Nek ci nek mi estas el la geŝaguloj; ne multe taŭgas sekvi niajn faradojn, escepte por doni plezuron unu al la alia.

Legante artikolon "*Iom da Muziko*" memorigis al mi ion, kion mi aŭdis antaŭ la historia periodo, t.e., kiam mi estis infanineto.

Sinjoro kiu ofte venis ĉe ni por fumi la pipon de amikeco kun mia patro, multe amuzis min per liaj anekdotoj. Foje li rakontis la sekvanton:—

Je Novjaro mi vizitis la gastaman Kapitanon

M— ĉeestis multaj parencoj, amikoj, konatuloj, k.t.p., inter kiuj estis junulo—ne tre bone konata. Oni petis ke li kantu.

"Ho jes! volonte mi kantas, sed eble vi permesos ke mi unue rakontos aferon—poste se vi tion deziras, mi tre volonte kantas!"

"Ĉe lernejo mi multe ĝuis la kantadon. Revenante hejmen maten-frue, mi fermis la pordon de mia dormoĉambro kaj tre kontente mi ekkantis belan himnon. Subite mi aŭdis teruran voĉon ekkrii "Tomaso! Tomaso! kion mi aŭdas? Vi malbona knabo, filo de respektindaj gepatroj, segi tabulojn je Dimanĉo! Venu tuj malsupren."

"Vi do vidas ke ili ne permesis al mi ekzercadon por plibonigi mian voĉon!"

Li silentis. Eble la gastoj dankis lin pro la rakonto, sed estas certe ke oni ne plu deziris ke li kantu!

Sed ni lasu tion—

Nu, Korbo kara, kion vi pensas pri mia verketo? Ĉu vi ĝin ricevos, aŭ ĉu vi preferas resti malplena?

## LI, ŜI, ĜI KAJ ALIA.

Originale verkita de Cynicus.

*Li.* Mi vidu, jen estas unu, du, tri—kvar fratŭlinoj. Mi miras kiu ŝi estas! Mi skribos al ŝi.

*Ĝi.* Estimata Fratŭlino,—Mi estus tre kontenta se vi korespondadus kun mi, letere aŭ per il. p.k. Via, k.t.p.

*Ŝi.* Ho! nova korespondanto! Ne malbona—bone elektitan karton—montras bonan guston—kaj—jes, estas bona skribmaniero. Ho jes, mi korespondados kun vi, sinjoro!

*Ĝi.* Estimata Sinjoro, mi dankas vin pro via beleta karto. Volonte mi interŝanĝos p.k. kun vi. Kiajn specojn da kartoj vi preferus? Mi sendos tiujn, k.t.p.

*Li.* Ha, la respondon al la mia! Kia belega karto! Ŝi havas bonan guston, kaj—jes—mi pensas ke mi ametos tiun ĉi fratŭlino.

*Ĝi.* Tre estimata Fratŭlino, estis kun ĝojo, ke mi ricevis vian agrablan respondon al mia karto. Mi estas tre feliĉa ke ĝi plaĉis al vi. Vi estas tre afabla, kara fratŭlino, demandi kiajn specojn da kartoj mi preferas. Mi preferus, kaj akceptos kun plezuro, k.t.p.

*Ŝi.* Kiel ĝentila! Jes, mi ametos tiun ĉi sinjoron.

*Ĝi.* Tre estimata sinjoro, kiel belegaj estas la kartoj, kiujn vi sendas. Ĉu vi kredas en Telepatio? Jus tiam, kiam vi sendis vian unuan karton, mi legis vian anoncon en la ĵurnalo, kaj mi ekpensis ĉu mi skribus al vi; sed la penso pasis, kaj mi ne skribis. Ĉu vi interesiĝis pri psikologio? Mi pensas, k.t.p.

*Li.* Ho, ho! jen estas alia psikologistino! Strange, kiel la virinoj amas ĉion kio estas mistika, nekomprenebla. Mi volus scii ĉu vere ŝi intencis respondi al mia anonco.

*Ĝi.* Kara Fratŭlino,—Ĉu mi kredas en telepatio? Certe, jes. Ĉu tiuj ĉi kartoj kiujn ni sendas unu al la alia ne estas pruvo? Ĉu vi ne observas, ke mi sendas la miajn en la sama tago ke vi sendas la viajn? Vere, kune ni pensas, kune skribas, kune sendas; devas esti do telepatio, kaj ni devas esti simpatiaj unu al la alia. Ni do estas ĝeamikoj, ne vere? Kiu scias, eble ni estas ĝeamikoj longe serĉitaj. Ĉu vi permesos al mi nomi vin amikino? Ho jes, mi tre interesiĝas pri psikologio, sed estas multaj branĉoj apartenante al tiu ĉi moderna "Arbo de Sciado." Kiun vi preferas, mi—k.t.p.

*Ŝi.* Ho, estas bone! Mi estas trovinta viron, kiu skribas tiel se mi estas inteligenta estaĵo.

*Ĝi.* Kara Sinjoro,—Ĝojege mi ricevis vian lastan karton. Kvankam mi demandis ĉu vi kredas en telepatio, mi ne scias ĉu mi kredas aŭ ne. Certe,

estas strange, ke ni ambaŭ skribas samtempe, sed estas ankaŭ strange ke vi deziras min nomi amikino. Kiel ni povas esti ĝeamikoj se neniam ni vidis unu la alia. Vere, mi timas ke vi ne trovos min esti tre interesa amikino, kaj baldaŭ vi bedaŭros ke vi tiel rapide volis nomi min "amikino." Ĉu vi preferus skribi letere? Ne estas sufiĉa spaco por skribi multe sur p.k. Kian branĉon de tiu kiun vi nomas la "moderna arbo de Sciado" vi preferus prikskribi? Ĉu vi scias ion ajn pri hipnotismo? Mi amus—k.t.p.

*Li.* Jes, mi amas tiun ĉi fratŭlino. Kial—mi ne scias—sed, mi amas ŝin.

*Ĝi.* Karega Amikino,

Ho ve! Ĉu vi koleros kontraŭ mi tiel skribinte. Ne mallatdu min, mi petegas. Sed se mi skribas "kara," ne estus vera. Vi estas pli ol "kara" al mi, tial mi skribas "karega." Ne, mi ne scias multe pri hipnotismo, sed mi timas ke vi scias tro multe, kaj ke vi min hipnotigis tiel, ke mi trovas mi mem devigata pensi pri vi kontraŭvole. De la ricevo de via unua karto, mi interesiĝis pri vi; de via unua karto mi vin amis, kaj nun mi vin amegas. Ĉu vi hipnotigis, aŭ ĉu vi ensorĉis min, mi ne scias; ĉio kion mi scias estas ke mi vin amegas, kaj atendas vian leteron kun la plej granda malpacieneco. Ho, kiel mi ĝojas ke vi permesas min korespondadi kun vi letere.

Sed kio vin interesiĝas, kian temon mi prikskribos? Mi mem? Eble vi ŝatus scii ion pri via korespondanto. Nu, mi havas tridek kvar jarojn—mi estas—ho, mi ne povas prikskribi min mem. Mi enmetas foton, kaj petegas ke vi estos malsevera kontraŭ tiu malbelulo. Ĉu vi sendos vian portreton al mi, karega amikino mia. Mi ŝatos ĝin supre ĉiuj miaj plej ŝatataj havoj. Mi estas—k.t.p.

*Ŝi.* Kia bona letero! Ho, mi estas tre feliĉa ke li skribis al mi. Certe, mi neniam antaŭe ricevis tiel bonan leteron.

*Ĝi.* Ne, kara amiko, mi ne estas kolera kontraŭ vi, ĉar vi nomas min "karega," kvankam mi miras. Sed mi avertas vin ke neniam mi kredas ion kion viro skribas al mi, kaj nur la duonon de tio kion li diras.

Nu, kio mi prikskribos? Min mem? Mi timas ke estas tiel malfacile skribi pri mi mem, kiel vi trovas malfacile skribi pri vi mem. Mia ago? Mi estas tiel malĵuna kiel Evo. Miaj haroj estas brunaj, ankaŭ miaj okuloj. Sed mi enmetas foteton, vi vidus kian specon da vizaĝo mi havas. Ha, vi trovos min tre malsprita; mallerta. Mi scias

nenion. Sed vi, vi ja povos skribi pri multaj interesaj aferoj. Vi estas artisto, vi loĝas en granda urbo; inter tre gaja, artista popolo; kaj certe, devas esti multaj okazoj kiujn vi povus bone priskribi.

Mi konfesas ke mi estas tre interesita pri karaktero. Mi bone ŝatas legi la vizaĝojn de tiuj kiujn mi renkontas. Mi ankaŭ legas la karakteron per la skribmaniero. Ha, ha, sinjoro! Vingardu! Baldaŭ mi lernos ĉion kion vi bone volus kaŝi de mi.

Ankaŭ mi konfesas ke mi amas tiri la ŝnuretojn kaj vidi la pupojn danci. Ĉiu, pli-malpli baldaŭ montras siajn malgrandajn malsaĝaĵojn—malfortajn punktojn, kaj tiam mi ridas. Ho jes, mi ridas! Denove, mi diras gardu vin bone, sinjoro! Jam mi vidas en vian foton, ke vi estas—ne, mi ne diros kion mi legas. Mi esperas—k.t.p.

*Li.* Skeptikulino, he? Nu, ni vidos ĉu mi povas ŝin kredigi je mi.

*Ĝi.* Ho, karulino mia! Kiel vi estas kruela! Kial vi ne kredas ke mi skribas la veron? Mi ĵuras ke mi amas vin, tiel neniam mi amis virinon antaŭe, kaj nur vin. Sed vi estas malboneta min dubi. Aliaj viroj eble diros al vi multe da tio kio ne estas vera—sed mi? Ho, kiel vi min vundas! Mi sentas ĉion kion mi skribis. Efektive mi amis vin, mi amas, kaj ĉiam mi amos! Mi ne scias kial vi estas tiel maljusta—k.t.p.

*Ŝi.* Ha-ha-ha! Li iĝas varma. Ni atendu.

*Li.* Neniam respondon! Kial, mi miras.

*Ĝi.* Ĉu mi ofendis vin, tre karega amikino mia? Mi petegas ke vi min pardonos, se jes. Ho, se vi povus scii kiel mi vin amas. Sed vi estas malvarma, kruelega—Ho, mi petegas, amu min iomete, se vi ne povas ami min tiel mi amas vin. Mi pensas pri vi de la mateno ĝis la nokto; ĉiame mi vidas vin antaŭ...k.t.p.

*Ŝi.* Tio ĉi estas amuziga.

*Ĝi.* Ne pli longe mi povas kontraŭbatali vin, Karulo. Jes, mi konfesas ke ankaŭ mi amas vin. Mia plej amata, se vi povus esti ĉi tie, mi montrus al vi kiel multe mi amas vin. Ho, karega mia, ĉu mi estas trovinta unu kiu amas min kiel mi deziras esti amata? Ĉu mi laste estas trovinta unu kiu min komprenas? Ho...k.t.p.

*Li.* Ha-ha-ha! Mi pensis ke mia lasta letero ŝin kaptus.

*Ĝi.* Ho, mia plej amata, mia ĉio, mia...k.t.p. (Post semajno).

*Ĝi.* { Ho! Mia karulineto...k.t.p.  
Ho! Mia karulo...k.t.p. (Post tri tagoj).

*Ĝi.* { Ho! Mia amatino...k.t.p.  
Ho! Mia amato...k.t.p. (La proksiman tagon).

*Ĝi.* { Ho!!!.....!! k.t.p.  
Ho!!!.....!! k.t.p. (La sama tagon).

*Ĝi.* { Ho!!!.....!!!! k.t.p.  
Ho!!!.....!!!! k.t.p. (Post tri monatoj).

*Ĝi.* { Jes, karulino mia, kiam ni renkontos en la proksiman monaton,  
Jes, karulo mia, Ho!!!.....!!!!.....!!!! k.t.p. (Post semajno).

*Li.* Mi pensas ke mi iros Londonon iom pli baldaŭ ol mi skribis. Mi volus ŝin vidi antaŭ ŝi vidos min. Certe mi volas vidi ŝin antaŭ ol mi—facile mi povos aliri al la strato, kaj atendi—(Al la Alia) Ni iros je la 21a anstataŭ la 27a, estas grava afero pri kiu mi devos zorgi. Estas tre ĉagrena, sed—

*Ĝi.* Karega karulino mia, mi estas korrompita. Mi ne povos alveni antaŭ la tria de Julio. Ho, kiel longe ŝajnos la tempo ĝis mi...k.t.p.

(En la 30a Junion).

*Ŝi* (al la Alia). Mi venos al via oficejo hodiaŭ post-tagmeze, kaj ni vespermanĝos ĉe la Frascati kafejon antaŭ iri al la teatro vespere.

(En la vespero de la sama tago. Ĉe "Charing Cross" Stacidomo).

*Li.* } (Renkontante). {!!!  
*Ŝi.* }

(Post kvin minutoj).

*Li.* } (Prezente la Alia). { Mia edzino.  
*Ŝi.* } Mia edzo.

Maljunaj geedzoj loĝis ĉe hotelo ne-vin-trinkeja. Sed la maljunulo ĉiam trinkis iom da viskio hejme, kaj li tial aĉetis botelon da ĝi en la urbo, por havi malmultajn gutojn ĉiunokte.

Kiam ili estis forirontaj, ili ne sciis kie kaŝi la malplenan botelon.

"Metu ĝin sur la supro de tiu alta vest-ŝranko," diris la edzino.

"Bonegan ideon," respondis ŝia edzo; "donu al mi seĝon, kaj mi metos ĝin tie."

Vigle staranta sur la seĝo, li ekvidis ke la ŝranko-supro estis tiel plenigita je similaj boteloj ke ne restas spaco por la lia!

Kompreneble la ĉambro-servistinoj neniam purigis tiun altan lokon.

(Vera Rakonto) A. BULLOCK WEBSTER.

## AMUZAĴOJ.

El la Hispana.—Tradukitaj de D. H. Lambert, B.A.

Foje la imperiestro Josefo, alveninte al ia urbo neakompanate de siaj korteganoj, estis demandata de la mastrino de la hotelo ĉu li estas unu el la imperiestra sekvantaro. “Ne,” respondis la princo. La scivoleco tamen de la bona virino ne kontentigis per respondo tiel mallonga. Si serĉis senkulpigon por eniri en lian ĉambron, kaj vidante lin razantan demandis ĉu li havas ian oficon apud la imperiestro. “Jes,” rediris la monarĥo, “Kelkafoje mi lin razas!”

\* \* \*

Estas kutime ke ĉasantoj interparoladu pri la eksterordinaraj okazoj kiuj sin montras dum ilia speciala pasatempo kaj trograndigu la ecojn de siaj hundoj.

Dum la mallacado de ĉasantaro inter kiu troviĝis Aleksandro Dumas, oni ekparolis laŭvice la ĉiaman temon pri la ĉashundoj. Dumas aŭdis siajn kunulojn rakonti la mirindan inteligentecon vidigitan de tiuj ĉi bestetoj. Kiam sia vico alvenis, li trograndigis ankaŭ la inteligentecon de sia propra hundo. “Ho!” li komenciĝis, “mia hundo posedas supereman lertecon unufoje kiam mi matenmanĝis en la ĝardeno kune kun amiko, Fanoro—kiel mi nomis mian hundon—atendis humile por ke, kiel kutime, mi disjetu al li la matenmanĝerojn. Sed, vidinte ke mi ne memoras lin, li forkuris al la fino de la ĝardeno, kaj venis

returnen al mi, alportante en la buŝo branĉeton da la floro nomita Ne-min-forgesu!”

\* \* \*

Notario prenis la veturilon por iri al urbeto proksima de Seviljo, kaj la veturigisto demandis al li dekkvar pesetojn.

“Ĉu vi volas certigi jure la koston de tiu ĉi vojiro?”

“Volonte, sinjoro.”

La notario tiam eltirinte el sia poŝo kaj stariginte sur la tablo krucifikson lin igis juri kaj donis al li ses pesetojn rimarkante ke li mem detenas la restaĵon kiel leĝan pagon pro la ago de la jurpropono!

\* \* \*

Reĝido volante fari ŝercon koncerne unu el siaj korteguloj, kiun li estis utiliginta diversamane kiel ambasadoron, diris al li ke li similas strigon. “Mi ne scias, Via Moŝto, kion mi similas,” li rediris, “tio kion mi scias estas ke multajn fojojn mi estas havinta la honoron prezenti Vian Reĝan Moŝton!”

\* \* \*

Ia sinjoro vespermanĝante en hotelo demandis al persono je sia flanko ke li bonvolu pasigi la mustardon.

“Ĉu vi kredas ke mi estas servisto?”

“Ho, ne, sinjoro,” rediris la alia, “mi supozis ke vi estas sinjoro!”

## STRANGA AVENTURO DE ĈIRKAŬKOLO.

Tradukita el Dickens de A. A. Cowan.

“Nu, Bob,” diris Hopkins je apenaŭ rimarkebla ekrigardo je la atenta vizaĝo de S<sup>ro</sup> Pickwick, “estis stranga malfeliĉo la lastan nokton. Infano enkondukiĝis, kiu estis glutinta ĉirkaŭkolon.”

“Glutinta kion, sinjoro?” interrompis S<sup>ro</sup> Pickwick.

“Ĉirkaŭkolon,” respondis Jack Hopkins. “Ne la tuton samtempe, vi scias, tio estus tro multa—vi ne povus gluti tion, sed la infano povis—he! S<sup>ro</sup> Pickwick, ha! ha!” S<sup>ro</sup> Hopkins ŝajnis multe kontentiga je sia plaĉaĵo; kaj daŭradis, “Ne, estas tiamaniere. La gepatroj de la infano estis

malriĉaj personoj kiuj loĝis en korto. La plejaĝa fratino de la infano aĉetis ĉirkaŭkolon, ordinara ĉirkaŭkolo farita el grandaj nigraj lignaj globetoj. La infano, kiu amis la ludilojn, prenis la ĉirkaŭkolon, kaŝis ĝin, ludis kun ĝi, tranĉis la ŝnureton, kaj glutis globeton. La infano pensis ke estis granda ŝercado, revenis la tagon plej proksiman, kaj glutis alian globeton.”

“Benu mian koron,” diris S<sup>ro</sup> Pickwick, “kia terurega afero! Mi petas por senkulpigo, sinjoro. Daŭrigu.”

“La plej proksiman tagon, la infano glutis du

globetojn; la tagon post tiu, li regalis sin je tri, k.t.p., ĝis dum unu semajno, li estis fininta la ĉirkaŭkolo, konsistanta el dudek kvin globetojn. La fratino, kiu estis diligenta knabino, kaj malofte aĉetis ian ornamaĵon por si, ploregis pro la perdo de la ĉirkaŭkolo; serĉis ĉie por ĝi; sed, mi ne bezonas diri, ke ŝi ne trovis ĝin. Post malmultaj tagoj, la familio estis je tagmanĝo—bakita ŝultro de ŝafo kun terpomoj sub ĝi—la infano kiu ne malsatis ludis ĉirkaŭ la ĉambro, kiam subite terurega bruoj audigis, tiel kiel malgranda, hajlventego. 'Ne faru tion, mia knabo,' diris la patro. 'Mi faras nenion,' diris la infano. 'Nu, ne faru ĝin ree,' diris la patro. Estis mallonga silento, kaj tiam la bruoj rekomencis pli laŭta ol antaŭe. 'Se vi ne atentis tion, kion mi diras,' diris la patro, 'vi trovos vin lite post tre mallonga tempo, mia knabo.' Li skuis la infanon por igi ke li obeu, kaj tiaj kraketoj sekvis kiajn neniu antaŭe aŭdis. 'Nu! estas en la infano!' diris la patro, 'li havas la krupon en la malprava loko!' 'Ne, mi ne havas

ĝin,' diris la infano, ekploranta, 'estas la ĉirkaŭkolo, mi glutis ĝin, patro.' La patro ekkaptis la infanon, kaj kuris kun li al la malsanulejo; la globetoj en la stomako de la knabo, kraketantaj la tutan vojon pro la ekskuado, kaj la homoj rigardantaj supre en la aero kaj malsupre en la keloj, por vidi de kie la nekutima sono venis. Li estas en la malsanulejo nune," diris Jack Hopkins, "kaj li faris tian teruregan bruon kiam li marŝis ke oni devis envolvi lin en la vesto de observisto, por ke li ne veku la malsanulojn!"

"Tiu estas la plej eksterordinara afero, kiun mi estas ja aŭdinta," diris S<sup>ro</sup> Pickwick je akcentega bato sur la tablo.

"Ho, tio estas nenio," diris Jack Hopkins, "ĉu estas, Bob?"

"Ne certe," respondis S<sup>ro</sup> Bob Sawyer.

"Tre strangaj aferoj okazas je nia profesio, mi povas certigi vin, sinjoro," diris Hopkins.

"Tiel mi inkliniĝas imagi," respondis S<sup>ro</sup> Pickwick.

## ETHELWALD KVIETIGAS LA MARON.

Tradukita el Angla-Saksona originalo, de G.L.B. kaj C.F.W.

Mi kun du aliaj fratoj venis Farnon la insulon. Intencis mi paroladi kun la honorinda patro Ethelwald. Poste ke mi kun la lia parolado estis konsolita kaj la lia benado estis al mi donita, kaj tiam kiam ni domon revenintaj jam estis sur la alta maro, subite disŝirigis la paco de la ĉielo kio estis reginta je la tempo kiam ni enŝipiĝis kaj tiel grava vetero ekalvenis kaj tiel furioza urago ekfalis ke ni nek kun velo nek kun remado povis eĉ iometete progresadi, kaj ni nepre nenio atendis krom la morto mem. Dume ke ni do tie plej longe kun la vento kaj la maro tute vane laboradis kaj bataladis, rigardis ni tiam malantaŭe por vidi se estus eble ke ni ree tentu atingi la insulon el kiu ni estis elvenintaj. Sed kien ajn ni nin turnis la sama urago nin renkontis, nin ĉirkaŭstaris, nin ĉirkaŭringis ĉiaparte kaj nenia espero de saviĝo jam restis al ni.

Post longe ni niajn okulojn suprenlevigis kaj ekvidis ni sur Farno la insulo, la al Dio karan patron Ethelwald'on elirantan el la lia sekreta loĝejo, volantan havigi al ni sukcesan kuradon, por vidi tion kio estis okazinta je ni; ĉar li estis aŭdanta la brudadon de la ventego kaj de la muĝanta maro. Kaj li, nin vidanta alportitajn en

dangeron kaj tiamaniere laborantajn, la genuojn fleksalis al Dio, Patro de Nia Sinjoro kaj Savisto Ĥristo, preĝanta pro la nia saviĝo kaj vivo. Kaj kiam li tian preĝon finigis, la superfluantaj akvojn li retransviligis, kaj la ventegon redefaligis, ĝis ke nepre la furiozeco de la ventego foriĝis kaj favorantaj ventoj nin kondukis sur plej trankvila maro al la bordo. Kiam do ni trafis la bordon, kaj la nian ŝipon ankaŭ el la ondoj forportis, samminute vento egale forta kiel antaŭe revenis, kvazaŭ ĝi dum tiu mallonga tempeto pro ni estis transviligita, kaj dum la tuta tago plej forte kaj furioze blovegis, tiel kiel oni versaĵne devus ekkredi ke la mallonga periodeto de trankvileco, kiu tiatempe okazis, nin estis aldonita de la Ĉielo, por favori tiun serviston de Dio, pro nia saviĝo preĝantan.

NOTE.—La Angla-Saksona teksto el kiu la jena historieto estas eltirita, presigis en la de Sinjoro Alfred Cook (Yale'a Profesoro) verkita libro nomita *Unua Libro de Antikva Angla*; plej interesplena kaj grava libreto por tiuj kiuj sin interesas pri la komencaĵoj de la hodiaŭa Angla Lingvo. La nunaj tradukistoj penadis konservi la stilon de la originala teksto.

## MALNOVAJ KANTOJ.

Tradukita de Clarence Bicknell.

Ne povas mi malnovajn kantojn  
 Rekanti kiel foje ;  
 La kor', la voĉo al mi mankus,  
 Mi plorus tro malĝoje.  
 En tiuj kantoj mia koro  
 Pasintajn tempojn trovas ;  
 Rekanti ilin, aŭ rerovi  
 La revojn mi ne povas.

Ne povas mi rekanti ilin,  
 Kaj la malĝojajn ĉarmojn ;  
 Iliaj melodioj vekus  
 El dorm' malnovajn larmojn :

Kvankam mi ne forgesas ilin,  
 Malĝojajn kaj dolĉegajn,  
 Mi tamen ne rekanti povas  
 La kantojn tro karegajn.

Ne, mi ne povas ! la vidaĵoj  
 Revenas pri la horoj  
 De oraj revoj forflugintaj,  
 Pri jaroj de doloroj ;  
 Sed, per rompitaĵ teraj ĉenoj,  
 L' anim', en libereco,  
 Rekantos eble tiujn kantojn,  
 Kaj dum la eterneco.

## LA ESPERANTA SUBJUNKTIVO.

La artikolo de D<sup>ro</sup> Lloyd ne konvinkis min, ĉar mi opinias ke, por uzi la imperativon, ne estas necese havi verbon esprimantan volon deziron aŭ permeson. Sufiĉas ke tia ideo estas (mi ne skribas "estu") en la penso de la parolanto. Nu, en la ekzemploj cititaj de D<sup>ro</sup> Lloyd, oni povas enŝovi la verbojn konformajn, ne ŝanĝinte la sencon.

"Li malkovris la manon, permesante ke la serpento tie mordu."

"La poŝto, volinte ke la leteroj estu tuj specigitaj, sendas specigistojn."

"Ŝi estis tiel maldika, ke kiam ŝi deziris ke oni povu ŝin rimarki, ŝi bezonis eniri du fojojn la ĉambron."

Nur, mi neniam skribos: "Mi timas ke li venu," ĉar, kiel tre ĝuste rimarkigis D<sup>ro</sup> Lloyd, ne estas en la frazo la plej malgranda nuanco de ordono aŭ deziro.

Mi konsentas ke tia maniero konsideri la aferon, devas ŝajni stranga al gramatikistoj. Sed mi pensas ke ĝi entenas logikecon, kaj, kio estas ankoraŭ pli grava, praktikecon. La reguloj kiuj regas la uzadon de Subjunktivo en naciaj lingvoj (almenaŭ en la Franca) estas terure arbitraj, tiel ke la gramatikistoj ne ĉiam konsentas pri ili, kaj ke eĉ kleraj personoj tre ofte malobeas ilin. Tio ŝajnas pruvi ke tiu modo estas tute senutila.

Kiel Esperanta profesoro, mi ekperimentis kiom malfacile estas doni precizajn regulojn pri tiu modo, kaj kontraŭe kiom estas praktika la principo donita en la paragrafo 218 de la Sintakso.

Jen kiel mi klarigas al miaj lernantoj la uzadon de la modoj.

La indikativo estas la modo normala. Oni devas uzi ĝin, kiam oni ne havas motivaĵon por uzi kondicionalon aŭ imperativon.

La kondicionalon oni uzu, kiam oni povas, ne ŝanĝinte la sencon, enŝovi "supozinte ke" en la unuan propozicion, kaj "en tia okazo" en la duan. Cetere la unua aŭ la dua propozicio povas esti Subaŭskultata. Ekzemple (Paragrafo 169, Sintakso):

"Se li estus riĉa, li havus multajn amikojn."  
 "Supozinte ke li estus riĉa, en tia okazo li havus multajn amikojn."

"Mi volus vin vidi!" "Supozinte ke tio ne malplaĉus al vi, en tia okazo mi volus vin vidi."

"Se mi povus lin venki!" "Supozinte ke mi povus lin venki, en tia okazo, kiel feliĉa mi estus!"

La imperativon oni uzu, kiam oni povas, ne ŝanĝinte la sencon, enŝovi, en la frazon, unu el la verboj voli deziri konsili permesi peti, k.c., kiuj montras volon pli malpli fortan. Mi jam donis ekzemplojn pli supre.

Ŝajnas al mi ke, tiam, la du lastaj modoj ludas sian logikan rolon, t.e., mallongigi la frazojn.

Mi bone scias ke oni povos trovi en Esperantaj libroj, eĉ en Zamenhofaj verkoj kelkajn frazojn kiuj ne estas konformaj al tiuj reguloj. Sed ili estas maloftaj, kaj tio, laŭ mi, ne pravigus la enkondukon de reguloj arbitraj neklaraĵ kaj senutilaj.

(Profesoro) H. SENTIS (Grenoble).



## FRAGMENTAJ MEMOROJ.

Originale verkita de Edward Metcalfe, M.A. (Oxon).

*La aŭtoro rezervas ĉiajn rajtojn.*

Mi verkis por tiu ĉi monato kelkajn detalojn pri vizito kiun ni faris al la bonekonata Kavernego Grandega de *Kentucky*.

Tra la Kavernego trafluas subteran riveron en kiu troviĝas du specoj da fiŝoj. Unu speco havas okulojn sed ne povas vidi; la alia speco (kiu eble enloĝadas la Kavernegon kelkajn centojn aŭ milojn da jaroj pli longe) tute ne havas okulojn.

Kaj nun mi petas, ke la leganto imagu kvardek personojn, el kiuj ĉiu portas lampon, postsekvante en la kavernego maljunan nigrulon kiun oni nomas "Onklo Nikoĉjo."

En Ameriko ĉiujn maljunulojn oni nomas "Onklo."

\* \* \*

Ni aŭdas solenan *tik, tak*, oni nomas ĝin la horologon. "Kiam oni streĉas ĝin, Onklo Nikoĉjo?" demandas nia sola knabeto. "Ho, tio! oni ĝin streĉis en la unua jaro de la mondo, Sonny (Fiĉjo)." Kiom da miljaroj faladas tiu guto da akvo!

\* \* \*

Ni vidis la fundon de la "senfunda profundejo"; ĝi havis nur kvin-dek futojn da profundeco. Sed de *Bourne's Dome* (la kupolo de *Bourne*), ni ne vidis la fundon.

Tiel kiel se ni estus starantaj ekstere ĉe fenestro ni ĝin rigardadis tra longa fendaĵo, elstreĉantaj en ĝin niajn kapojn por pli bone vidi, tuj kiam Onklo Nikoĉjo kiu estas supronrampanta sur la eksteron de la kupolo, trapuŝas tra negranda malfirmaĵo lumegigilon, kiu lumegigas la mirindajn akvoskulptaĵojn de la flankaj kaj de la interno de la kupolo. Fine li faligis ĝin kaj tuj la ombroj forrabas de niaj okuloj la belegan kupolinterton, sed falinte ĝi malkaŝas ĉiam novajn belaĵojn sur la flankaj. Ĉion lumigegante ĝi preterfalas kiel strio da lumo nian fendaĵon, kaj postsekvante ĝin per niaj rigardoj, ni vidas ke ĝi estas nun nur malgranda punkto da lumo, sed ĉiam (ĉar Onklo Nikoĉjo faligas multajn lumegilojn) ĉiam, antaŭ ol atingi la fundon de la putego ĝi estingiĝas. Mi ne atencos priskribi la akvoskulptaĵojn. Se lertegaj koboldoj estus tien skulptintaj siajn plej fantaziajn sonĝojn, ĝi estus tiel, kiol ĝi estas, belega, teruriga, mistera, fantazia!

\* \* \*

Ni eniras kavernon (en la kavernego estas multaj kavernoj). Subite oni elstreĉas brakon kaj haltigas min. Ni staras ĉe la bordo de trankvila maro, kaj radioj de la hela luno lumigas sur grandajn

blankajn nubegojn amasigitaj unu super la alia ĉe la horizonto de la maro. Mi aŭdas elspirantan murmuron: "Kiel belege! Kiel belege!" Jes, sed tiuj lancaj nuboj estas solida ŝtonego, kaj la trankvila maro terurigege krutaĵo. Vere tiu brako savis min de subita morto!

\* \* \*

Proksime de la dometoj de ftizo suferintoj (ili ĉiuj mortis) ni trovis kelkajn stipojn, sur kiujn, laŭ peto de nia gvidisto, ni ĉiuj sidiĝas.

Tiam Onklo Nikoĉjo kolektas niajn kvardek lampojn kaj foriras, nin lasante en vera mallumejo.

Antaŭ kaj plej proksime de miaj okuloj mi metas mian blankan manumon sed neniel mi povas ĝin vidi. La mallumo fariĝas solida kaj premas sur nin tiel kiel se estus vivanta korpo. Mi pripensas tiun Egiptan mallumon kiun oni povis palpi. Ĉiu voĉo mallaŭtas; oni parolas nur per murmuroj kiuj, tamen, ŝajnas forkuri en la mallumon kaj kriigi la vortojn al la Spiritoj de la Kavernego.

Subite—"Rigardu supren! Ho! rigardu supren!" Supren mi rigardas kaj mi vidas—kion?

Nur ke oni estas formovinta la supron de la Kavernego, kaj ke mi sidas ĉe la fundo de profundega fendaĵo. Senlime super mia kapo altenendiĝas ĝiaj du flankaj. Estas meznokto, ĉar laŭ diferencaj lumpovoj brilas en la trankvila ĉielo grandega stelaro. Jus enirinte la videblan porcion de la ĉielo mi vidas kometon.

Trankvila ĉielo? Jes, ĉe tiu unua rigardo mi pensas, ke la nokto estas treege trankvila, sed baldaŭ nigra, treege nigra nubego malrapide surpasas la ĉielon kaj unu post unu englutas ĉiujn la helajn stelojn. Ne, la stelaro venkas! La nubego pasas kaj, jen, ankoraŭ la steloj trankvile briladas en pura, sennuba ĉielo.

Sed, kio? Kio okazas?

*La nubego revenas malantaŭen!*

Ho! Onklo Nikoĉjo, Onklo Niĉjo, pro kio vi faris tion? Vi forrabas de mi la tutan iluzion. Eĉ se la nubego estas nur ombro de la mano de maljuna nigrulo, ĉu ĝi devas iri malantaŭen?

Ĉio finiĝas. Onklo Nikoĉjo revenas. Ni reprenas niajn lampojn.

Ni realvenas la feran Pordegon.

Al Onklo Niĉjo ni adiaŭas kaj al la Kavernego.

Kaj mi? Jes ĉio finiĝas. Mi ankaŭ adiaŭas al la aminda Legantaro.

(FINO).

## KRISTNASKA KANTETO.

Originale verkita de Esperantisto 4686.

Jen Kristnasko alveninta,  
De la tuta mond' benita,  
Ĉar naskiĝis Filo Dia  
Kiu estas Frato nia.

La pastistoj kiuj aŭdis  
La sciigon Dion laŭdis,  
Tiam en la groton venas  
Kiu l' infaneton tenas.

Kaj el malproksima lando  
Lin vojaĝis reĝa bando,  
Oron, mirhon donacante,  
Dian Filon rekonante.

Do la tuta mondo iru  
Kaj ĉe la mangujo miru :  
Kun Mario la genuo  
Fleksu antaŭ Li, Jesuo.

Kantu per ĝojega krio  
Pri Jesuo kaj Mario ;  
Ŝi patrino sen makulo,  
Li la sola Nepekulo.

Kantu ĉia homa koro  
"Estu al Jesu' honoro,  
Kaj alvenu en la teron  
Pacon, la homaresperon."

Sed ne sole kantu—AGU—  
Nun al la fratar' elpagu ;  
La infanojn, malsanulojn  
Amu, kaj la mizerulojn.

## DUOBLA AKROSTIKO.

Verkita de Clarence Bicknell.

SOLVO.

- |   |  |
|---|--|
| 1. <i>BAZARO</i> estas l' elspezejo.    | 1. Por la <i>EDZINO</i> plezurejo.     |
| 2. <i>ISLANDO</i> la insul' ; persikoj  | 2. Ne kreskas tie, sed <i>SALIKO</i> . |
| 3. <i>CIGARO</i> pliplaĉas ol pilolo,   | 3. En min pafata el <i>PISTOLO</i> .   |
| 4. <i>INSEKTOJ</i> ofte enuigas.        | 4. <i>EKSKURSON</i> ili malbonigas.    |
| 5. <i>KRISTAL'</i> da neĝo je l' mateno | 5. Briladas kiel la <i>RUBENO</i> .    |
| 6. <i>LIKVORO</i> homon malsanigas.     | 6. <i>ABSINTO</i> ofte lin mortigas.   |
| 7. <i>ELEKTRO</i> estas lumigilo.       | 7. <i>NEBULO</i> fantomdistililo.      |
| 8. Kun la <i>TORNISTRO</i> eleganta     | 8. <i>TURISTO</i> marŝas eĉ kantanta.  |
| 9. L' <i>ORGANO</i> estas preĝamiko.    | 9. L' <i>ORKESTRO</i> la opermuziko.   |

Per *BICIKLETO* mi fremdulajn landojn vidas,  
Sed *ESPERANTO* min al homaj koroj gvidas.

## ESTIMATAJ KUNVERKINTOJ &amp; LEGANTOJ,

La jaro 1905 finiĝas, kaj mi uzas la okazon por sendi la bonvenan antikvan bondeziron pro **ĜOJA KRISTNASKO & FELIĈA NOV-JARO.**

Neniam nia lingvo ĝuis jaron tiel prosperan, kiel la nuna, kaj ekzistas ĉiu signo ke la progreso daŭros. Legantoj estas pli multenombraj, kaj ili nature atendas, ke la naciaj kaj internaciaj gazetoj laŭte pligrandiĝu.

La Enhav-nomaro de nia lasta dozeno da numeroj montras, ke niaj multaj kleraj verkintoj donis materialon por plej interesa serio, kaj ni esperas, ke Esperantistoj legos niajn du volumojn kun plezuro kaj profito je la estontaj jaroj.

Gazeto kies enhavo estas literatura pli ol kronika, havas ĉiaman intereson, kaj ni do rigardas la volumon, kiel notinda aldono al la Esperanta Biblioteko.

La redaktado kaj direktado de internacia organo estas laboriga entrepreno, postulante pli da tempo ol mia ĉiutaga okupado permesas por la kreskantaj bezonoj de tiu ĉi gazeto. Ni do devis fari novajn planojn por la estonteco.

De nun la *British Esperantist*, kun sia kroniko kaj naciaj artikoloj, kaj nia malnova **THE ESPERANTIST** aperos sub unu kaj la sama kovrilo.

La preslitteroj kaj ĝenerala formato estos samformaj kun tiuj de la du volumoj de **THE ESPERANTIST**, la nombro da paĝoj estos pligrandigata de dek ses ĝis dudek, la jara abonpago restanta la sama 3s. (4 frankoj) afrankite.

La Esperantistoj do ricevos pli dikan gazeton pro la sama malgranda abonpago.

Mi do fidus, ke la amikoj kies skribaĵoj riĉigas niajn presitajn numerojn, afable daŭrigos sian helpon, kaj, per internacie verkitaj artikoloj, varbos multopajn abonojn kaj reklamojn, kaj tiel ebligos ke la *Esperanta Gazeto de Granda kaj Pli Granda Britujo* okupu sian konvenan lokon en Esperantujo.

La numero de la nuna monato do estas la lasta eldonata sub mia sola direktado; de nun mi estos nur membro de la Redaktora Komitato de la unuigitaj gazetoj.

Je tiu ĉi okazo mi volas danki kore, korege la multajn amikojn, kiuj tiel neatendite sukcesigis miajn penadojn, kaj kiuj igis tiel plezurdonan mian pro-Esperantan klopodadon.

Senŝancele mi konstatas, ke pli sindona, simpatia kaj helpema legantaro estus malfacilege trovebla.

**THE ESPERANTIST**, la unua Angla Esperanta Gazeto, donas indikilon de Brita progreso, kaj, monato post monato, sukcesis atingi tre altan

## ESTEEMED COLLABORATORS AND READERS,

The year 1905 is drawing to a close, and I take the opportunity of sending the good old wish for **A MERRY CHRISTMAS and A HAPPY NEW YEAR.**

Never has our language enjoyed a year so prosperous as the present, and there is every indication that progress will be maintained. Readers are more numerous, and they naturally expect the national and international gazettes to become enlarged accordingly.

The Index of our last twelve numbers shows that our many talented writers have provided material for a most interesting series, and we hope that Esperantists will read our two volumes with pleasure and profit in the years to come.

A magazine, the contents of which are literary rather than newsy, has a permanent interest, and we therefore regard the volume as a noteworthy addition to the Esperantic Library.

The editing and management of an international magazine is an onerous undertaking, involving more time than my present daily occupation will allow for the growing needs of this gazette. We have, therefore, had to make new arrangements for the future.

Henceforth the two British magazines will join forces. The *British Esperantist*, with its chronicle and national articles, and our old **THE ESPERANTIST** will appear under one and the same cover.

The type and general form will be uniform with the two volumes of **THE ESPERANTIST**, the number of pages will be increased from sixteen to twenty, while the annual subscription will remain the same, 3s. (4 francs), post free.

Esperantists will thus get an enlarged gazette for the same small subscription.

I, therefore, trust that the friends whose writings enrich our past numbers will kindly continue their aid, and, by internationally-written articles, will secure manifold subscriptions and advertisements, and so will enable the *Esperanto Gazette of Great and Greater Britain* to occupy its proper place in Esperantoland.

The present month's issue is, therefore, the last one produced under my sole care. Henceforth I am merely a member of the Editorial Committee of the united gazettes.

On this occasion I wish to thank heartily, most heartily, the many friends who have in so unexpected a manner made my efforts successful, and have rendered pro-Esperanto work so pleasant.

I unhesitatingly affirm that more devoted, sympathetic, and helpful readers would be difficult to find.

**THE ESPERANTIST**, the first English Esperanto journal, affords an index of British progress, and

Ĥokon inter siaj samtempaj ĵurnaloj. Eble la ĝustatempeco de ĝia eldoniĝo, kaj allogeco de ĝia formo helpis multe je la trafo ĉe tiu ĉi kontentiga rezultato; sed estas ĉefe pro la entuziasmo de la ĉiam plimultiĝanta aro da Angle-parolantaj samideanoj.

Dudekses monatoj povas esti mallonga porcio el la homa, se ne gazeta, vivo; tamen, por mi, tiu ĉi epoko ja estas estinta okupata. Centoj da novaj amikoj el multaj nacioj estas trovintaj loĝejon en la koro, kaj miloj da plezuraj memoroj gravurigis ĉe la memoro.

Sur nia unua numero ni esprimis nian intencon ne presigi politikajn aŭ religiajn aferojn. Ni fidis, ke la sekvo de tiu ĉi propono kontentigis. Tamen, laŭ la pli ĝenerala alprenado de Esperanto, ni devas atendi la eldoniĝon de specialaj organoj pritraktantaj temojn plej necesegajn al la homa progresado.

Jam ni plezure vidas la aperon de tiaj gazetoj, kiaj *Katolika Espero* & *Espero Pacifisto*.

Tamen estas multe dubinde ĉu ankoraŭ venis la tempo por la naskiĝo de Politika revuo en Esperanto.

Ĉi tie, en Anglujo, ni nune atendas multe pri inter-kolonia politiko, kaj ŝajnas al ni, ke estas nur unu sola prava politiko por Esperantujo—*inter-samideaneco*.

Se ĉiuj Esperantistoj unuigos kaj aĉetos la komercaĵojn de Esperantistoj, ni baldaŭ havos fundamenton fortikan kaj larĝan, kapabla porti konstruaĵon, havu ĝi kiom ajn da alteco. Ne estas necese longe serĉi la okazojn. Sur la *THE ESPERANTIST* oni jam altiris la atenton al multaj komercaj fakoj. Ekzemple: Ni sendu niajn 2 aŭ 3 frankojn al Bulgarujo por la vera Roz-esenco; aŭ al Glasgovo por la bonaj viskio kaj cigaredoj bezonataj por niaj Kristnaskaj regaloj; por Esperantaj ĉemizoj por varmigi nin; por kukaĵoj surhavantaj Esperantajn devizojn por doni al niaj amikoj.

Tiuj ĉi kaj senfina aro da aliaj necesaj povos uziĝi por antaŭenirigi la Aferon.

Ĉi tiu estas taŭga konkludo por la unua parto de la vivado de la *THE ESPERANTIST*, kaj la gazetoj, sub sia nova kaj pligrandigata formo, trovu la plifortigon, kiu nature rezultos post ĝia alpreno.

Kvankam mi ne plu povas sendi ĉiumonatajn salutojn por gazeto kiu, de komenciĝo ĝis fino estis por mi granda fontego da plezuro kaj (ho, ne rakontu ĝin en Gath) ankaŭ de fiereco, mi tamen esperas, ke ĉiuj Esperantaj amikoj konservos afablajn pensojn pri sia entuziasma samideano kaj kunlaboranto,

H. BOLINGBROKE MUDIE.

month by month has succeeded in attaining a very high place among its contemporaries. Maybe the punctuality of its publication and attractiveness of its form have helped considerably in achieving this gratifying result; but the fact is in the main due to the enthusiasm of the ever-increasing band of English-speaking adherents.

Twenty-six months may be a short time in the life of a man, if not of a journal, yet, for me, this period has indeed been a crowded one. Hundreds of new friends of many nationalities have found place in the heart, and thousands of pleasant memories have become engraved on the memory.

In our first number we expressed our intention of not including political and religious matters. We trust that the adherence to this policy has given satisfaction. Nevertheless, as Esperanto becomes more generally adopted, we must expect the appearance of special organs treating of the subjects most vital to human progress.

Already we are glad to note the appearance of such periodicals as *Espero Katolika* and *Espero Pacifisto*.

But it is a much doubted point whether the time is yet ripe for the birth of a political review in Esperanto.

Here, in England, we are at present hearing much of an inter-colonial policy, and it seems to us that there is only one sound policy for Esperantoland—an inter-Esperantist policy.

If all Esperantists will unite in purchasing the commercial products of Esperantists, we shall soon have a sound and broad foundation capable of bearing the weight of a structure, be it never so lofty. Opportunities are not far to seek. In *THE ESPERANTIST* attention has already been directed to many branches of commerce. Thus, for example, let us send our 2 or 3 francs to Bulgaria for the real attar of roses; or to Glasgow, for the good whiskey and cigarettes needed for Christmas cheer; for Esperanto shirts to keep us warm; for cakes bearing Esperanto mottoes to offer to our friends.

These and an endless supply of other necessities can be used to help forward the Cause.

This suggestion forms a fitting close to the first part of *THE ESPERANTIST*'s career, and may the gazettes, in their new and enlarged form, experience the stimulus which would naturally result from its adoption.

Although no longer able to send greetings every month by a gazette which, from start to finish, has been to me a source of great pleasure, and (oh, tell it not in Gath) of pride also, I yet hope all Esperanto friends will retain kind thoughts of their enthusiastic fellow-thinker and fellow-worker,

H. BOLINGBROKE MUDIE.

## PREGO SUB LA VERDA STANDARDO.

Himno de D<sup>ro</sup> Zamenhof.

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
 Fortego la mondon reganta,  
 Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero,  
 Kaj fonto de vivo konstanta,  
 Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,  
 Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,  
 Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas,  
 Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,  
 Kun dogmoj de blinda fervoro ;  
 Silentas nun ĉiu disput' religia  
 Kaj reĝas nur kredo de koro.  
 Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,  
 Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,  
 Ni staras nun filoj de l' tuta homaro  
 Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
 Sed ĝi sin dividis battle ;  
 Popolo popolon atakas kruele,  
 Frat' fraton atakas ŝakale.  
 Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,  
 Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,  
 Redonu la pacon al la infanaro  
 De l' granda homaro !

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,  
 Por reunigi l' homaron.  
 Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,  
 Sed lasu nin venki la baron ;  
 Donacu Vi benon al nia laboro,  
 Donacu Vi forton al nia fervoro,  
 Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj  
 Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos ;  
 Ĝi signas la bonon kaj belon.  
 La Forto mistera de l' mondo nin benos,  
 Kaj nian atingos ni celon.  
 Ni inter popoloj la murojn detruos,  
 Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos  
 Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
 Ekregos sur tero.

*N.B.—Muziko por tiu ĉi poemo baldaŭ eldoniĝos.*

## ESPERANTO HYMN OF PEACE.

Translated by W. M. Bassett.

O Thou mighty spirit in mystery shrouded,  
 Whose hand is controlling and guiding,  
 O fountain of truth and of love never clouded,  
 And life-source for ever abiding,  
 How varied our notions concerning Thy being !  
 But sense of Thy presence brooks no disagreeing ;  
 And therefore we come, O Creator, before Thee,  
 This day and adore Thee.

To Thee we come not with the creed of a nation,  
 Or zeal for inconstant opinion ;  
 All discord abandoned and vain disputation  
 The faith of the *heart* has dominion ;  
 Suffices this faith ever just and impartial,  
 Whose weapon is truth—not an implement martial :  
 Before Thee we children of men take our station,  
 In deep adoration.

All men in the beauty of grace Thou didst fashion,  
 But hate parted one from another,  
 And nation arose against nation in passion,  
 And brother took arms against brother.  
 O Thou the unknown and the mighty and holy,  
 Regard with compassion the prayer of the lowly,  
 Grant peace to humanity's children and bless  
 them—  
 Let war not distress them.

We called Heav'n to witness the promise recorded,  
 To make human friendship our mission,  
 And O Thou most High if Thy help be afforded,  
 Success will attend our ambition.  
 Thy blessing command to inspire and assist us,  
 Thy aid that when forces of evil resist us,  
 However determined they will not dismay us,—  
 Thou, Thou wilt repay us.

The fair flag of Hope waves in glory and splendour,  
 Of beauty and goodness the token ;  
 The great unseen Power of the world, our defender,  
 Will honour the word he has spoken.  
 The walls of partition that long have divided  
 The peoples—by error and folly misguided—  
 Shall fall ; and Love's empire grow greater and  
 greater  
 From pole to equator.

*Note.—Music to the above will appear shortly.*

ENHAVARO DE "THE ESPERANTIST." VOLUMO II. NUMEROJ 15—26.

- ANANDO. Voĉo el la Himalajo, 65.  
 ARCHIBALD, J. R. Kukajetoj, 43.  
 — Katino & Kokidoj, 67.  
 B. 10549. Pri Fantomo, 79.  
 — Tri Verdaj Kornoj, 108.  
 — Dialogo pri Elizio, 181.  
 BAISSAC, A. La Papo Mortis, \* 56.  
 BASSETT, W. M. *Esperanto Hymn of Peace*, \* 191.  
 BAUER, E. La Urbo de Demonoj, \* 71.  
 — Letero al Bapto-Patro, \* 119.  
 BEARNE, F. E. La Griza Ĉevalo, 125.  
 BICKELL, C. S. Ofero de Skulptisto, \* 47.  
 BICKNELL, C. *Kristnasko*, 1, 188.  
 — *Fablo*, 27.  
 — *Papilio*, \* 37.  
 — *Hundaj Rimarkoj*, 59.  
 — *La Sonĝo de Klarenco*, \* 70.  
 — Moderna Ermito, 81.  
 — *Korsikujo de Italujo*, 112.  
 — *La Galanto*, 141.  
 — *Duobla Akrostiko*, 163, 188.  
 — Memorajoj pri Kongreso, 168.  
 — *Ho Lando Nia!* 169.  
 — *Ho Vivadu!* 169.  
 — *Malnovaj Kantoj*, \* 186.  
 B & W. Ethelwald kvietigas la Maron, \* 185.  
 BLOTT, A. Bulonja Kongreso, Parto II, 145.  
 BOOTH, J. Ŝaftondado en Aŭstralio, 7.  
 BURJADE, P. Renkontiĝo neatendita, \* 52.  
 BUSUTIL, DR. G. Kapelo el Ostoj, 33.  
 CATT, E. J. Profesoro Vulpo, \* 15.  
 — Korbo por Forĵetitaĵoj, 181.  
 COWAN, A. A. Sur la Glacio, \* 78.  
 — Stranga Aventuro de Ĉirkaŭkolo, \* 184.  
 COX, GEN. G. Koloniigado en Ameriko, 74.  
 — Savita de Morto, 98, 126, 136, 149, 174.  
 CYNICUS. Li, Ŝi, Ĝi & Alia, 182.  
 DEXTER, W. Pri la Arto, 159.  
 E.W. Vivieno, 11, 22.  
 — Davdo Dhu, 49.  
 — Doni aŭ ne Doni, 87.  
 — Ermito preskaŭ moderna, 100.  
 — Pri la Malsato, 124.  
 — Ĝako, 165.  
 ELLKEDER, O. I. Kiam ekfloras Rezedoj, 13, 24, 40.  
 ELMY, B. *Nevenkebla*, \* 63.  
 ELMY, B. *La Hispana Armiŝparo*, \* 102.  
 EMPTAGE, S. H. La Fratoj de Birchington, 92.  
 EVANS, REV. T. E. *La Ora Horo*, \* 90.  
 FRENKEL, R. *El Lermontov*, \* 155.  
 GAUNTLETT, E. Protekto de Anglo, 77.  
 GORDON, COL. H. K. Hindustani & Esperanto, 8.  
 — Stato de Esperanto en Britujo, 47.  
 — Orientaj Notoj, 107, 114, 135, 150, 162.  
 GRABOWSKI, A. *Lasta Rozo de Somero*, \* 176.  
 — *Kanto Pri l' Vento*, \* 178.  
 GUERSENT, C. La Konscienco, \* 69.  
 H.T. Vizito al la Kortego Ĥina, 26.  
 HAXTON, J. T. *La Domo de Jak*, \* 10.  
 — St. Andrews en Somero, 31.  
 HEATH, J. Ŝtonigita Arbaro, 54.  
 HENDERSON, G. J. Internacia Lingvo de Hindujo, 45.  
 HOSKISON, T. Eksterdoma Instruado, \* 58.  
 HULME, A. J. Henriko VII. eniranta Shrewsbury, 17.  
 — Iometo da Muziko, \* 103.  
 KEESING, M. *Klopedu!* 119.  
 KOLOWRAT, G. Ĉ. Revo, 74.  
 LAMBERT, D. H. *Pri Libreto*, 36.  
 — Balo de Enmaskigitoj, \* 56.  
 — Koniston & Grasmere, \* 62.  
 — *Dante, Kanto I.*, \* 176.  
 — Amuzajoj, 184.  
 LAW, G. C. Juna Financisto, 125.  
 — Virino la Nekomprenebla, \* 142, 152, 165.  
 LEGGE, DR. R. La Kat-Nesto, 23.  
 LEROUX, C. Hundo de Brisquet, \* 139.  
 LLOYD, DR. R. J. Gramatika Terminaro, 116.  
 — Esperanta Subjunktivo, 170.  
 LOJKO, V. El "Korbo de Pensoj," \* 64.  
 — *Pino*, \* 99.  
 MARÉCHAL, F. L. G. Unua Violono, 28, 44, 53.  
 MEIGH, F. A. Skota Persisto, 15.  
 — Konscienco Malkuraĝigas, 61.  
 — Vilaĝaj Sportoj, 75.  
 — Memoraj pri Irlando, 88.  
 — Pasko en Irlando, 122.  
 — Kamparaj Amuzajoj, 160.  
 MESSERLY, G. O. La Insulo Margarita, 32.  
 METCALFE, E. *Demando*, 1.  
 — Fragmentaj Memoraj, 12, 29, 41, 55, 76, 84, 104, 113, 137, 154, 172, 187.  
 MOTTEAU, A. *Lampiro & Bufo*, \* 1.  
 — La Olivoj, \* 9.  
 — *Legendo de Animo Fidela*, \* 37.  
 — *Leono & Kulo*, \* 57.  
 — *Morgaŭ*, \* 68.  
 — *La Sinapsemero*, \* 91.  
 — La Kvar Henrikoj, \* 107.  
 — *Kverko & Kano*, \* 157.  
 NIPPA, A. *El Puŝkin & Lermontov*, \* 43.  
 OFFICER, W. Aventuro Terura, 108.  
 — Mutulo de Kirkmillar, 177.  
 OXFENFORD, C. La Ora Koro, 82.  
 PARISOT, J. *Pluva Tago*, \* 75.  
 — *Nega Supro*, 159.  
 PETROV, P. Pluvo, \* 60.  
 PHILIPPET, DR. La Malsanuleto, \* 144.  
 PRIVAT, E. La Maro, \* 180.  
 RANDALL, A. Sanskrita Legendo, \* 66.  
 RAYTCHEFF, I. La Rozesenco, 93.  
 REDDET, S. *La Fortisto*, 67.  
 — *Staru, Homaru, Staru*, 173.  
 — *Revado*, 180.  
 REEVE, C. W. T. *Fremdulo en Fremdlando*, 89.  
 ROSE, D. S. *Barkarolo*, \* 18.  
 ROWE, F. G. *Dormu* (Lulkanto), 48.  
 SENTIS, H. La Esperanta Subjunktivo, 186.  
 SIMON, A. *Popola Versaĵo*, \* 127.  
 — Budho la Semisto, \* 171.  
 SOUTHCOMBE, H. W. Parado ĉe Sherborne, 140.  
 T.A.C. La Fajr-trapaŝado, 31.  
 TAYLOR, P.C. Vera Rakonteto, 158.  
 THILANDER, H. J. E. Braille Vortaro, 127.  
 WACHTER, A. Maljuna Sonorigisto, \* 5.  
 — Majstro Pasero, 80.  
 WESTCOTT, DR. M. El Egiptujo, 45.  
 — Esperanta Rondiranto, 111.  
 — Nova Libro pri Francoj, 123.  
 — Authoritative Teaching, 158.  
 — La Fumpotĉapelo, 178.  
 — Egiptujo kiel Vintra Loĝejo, 179.  
 YOUNG, E. *El Nova Zelando*, 112.  
 REDAKTORO. 2, 15, 16, 19, 34, 51, 87, 94, 97, 105, 121, 130, 142, 151, 189, k.t.p.



# ESPERANTISTS SHOULD ALL POSSESS:

|  |    |    |            |
|--|----|----|------------|
| Fundamenta Krestomatio, or Guide to Esperanto, by Dr. Zamenhof.  | 7  | 0  | post free. |
| La Vantage (Bhakaspiro's "Tempest"), translated by A. Malczan. Art. Clodó<br>(Cover, with Illustrations) | 2  | 2  | ..         |
|  | s. | d. |            |
| Hamlet (translated by Dr. Zamenhof)  | 2  | 0  |            |
| Prinsaj (Prince Subjects)  | 3  | 6  |            |
| Hivresoj   | 1  | 6  |            |
| Advektivo Parolita (Humorous Play)   | 0  | 9  |            |
| La Avarulo (Molière)   | 0  | 9  |            |
| Elektaĵoj Feliĉoj de Lafontaine  | 0  | 9  |            |
| Vojaĝo Interno de mia Ĉambrulo (de Maitre)   | 0  | 9  |            |
| Komercaj Leteroj   | 0  | 6  |            |
| Pravlibro de la Turisto (in 6 languages)   | 0  | 6  |            |
| Elkato de Formikoj   | 0  | 7  |            |
| Pagaj el la Flandra Literatura   | 1  | 6  |            |
| Konflikanta (Ibrahimski)   | 2  | 0  |            |
| Kuzina Munko-ĝo  | 0  | 4  |            |
| Esperanta Vocabularo   | 0  | 11 |            |
| Ened (Kantato 1 and 2)   | 0  | 7  |            |
| Tutmonda Juĵituro  | 0  | 0  |            |
| Kain (Byron)   | 1  | 0  |            |
| Complete Text-Book   | 1  | 6  |            |
| English-Esperanto Dictionary   | 2  | 8  |            |
| Esperanto-English Dictionary   | 2  | 8  |            |
| First Lessons (in Eng., Fr., It., Sp., or Pg.)   | 0  | 1  |            |
| Grammar and Exercises (Goughogian)   | 1  | 7  |            |
| Thirty-six Exercises and Keys (Molles)   | 1  | 4  |            |
| Grammario (in French, by de Beaufront)   | 1  | 0  |            |
| Commentaire (ditto)  | 2  | 0  |            |
| Corrige de la Grammaire  | 0  | 8  |            |
| Ekzercoj de Aplikado (de Beaufront)  | 1  | 0  |            |
| Esperanto en six leçons  | 0  | 10 |            |
| Vocabulaire Français-Esperanto   | 2  | 6  |            |
| Dictionnaire Esperanto-Français  | 1  | 6  |            |
| Esperanto-Roukoko (Frontier)   | 1  | 6  |            |
| Universala Vortaro (in 3 languages)  | 1  | 0  |            |
| <b>Siklingoj por Venki, Dramato-Ĝenero</b><br>Habitakulo, inventita de A. Malczan<br>(Art. Clodó)        | 2  | 2  |            |
| Ekzamenoj and Ety  | 1  | 0  |            |

And The Esperanto Language, Practically Considered and Described  
—by R. J. Lloyd, D.Lit., M.A., F.R.S.E. (Art. Clodó), portrait, 6001, 1001, each 1/- in 16 per doz.

Picture Postcards, 1/- per 25.      Steletoj, 8d. each.  
How to read Esperanto, 1/- per dozen.

The above, and all other Esperanto Works and Periodicals, can be obtained by  
writing to "The Esperantist," 67, Kensington Gardens Square, London, W.

A NEW SPECIALITY specially arranged for  
Foreign and Colonial Esperantists is

## La Biblioteko Esperanto.

A SELECTION OF      (With catalogue, bound with the  
BOOKS AT      containing an address list, and  
POSTAGE FREE.)      these are sent entirely gratis.)

Prices 2s. 6d., 3s., 4s.      (Special Catalogue will be sent on request, but  
sent gratis only on request.      From THE ESPERANTIST.)



